

Henriko Senkeviĉ

KIEN CI IRAS?



*El la pola lingvo tradukis*  
Lidja Zamenhof'

*La tradukon prilaboris*  
Sergio Pokrovskij

Internacie ĉi tiu verko estas la plej fama romano de la pola literaturo, kvankam en Esperantujo «Marta» kaj «Faraono» estas pli aŭtoritataj.

La pola originalo titolita «*Quo vadis*» (latine tio signifas «Kien ci iras?») unue aperis en 1896. Ĝi temas pri la frua kristanismo sub la romia imperiestro Nerono. Ĝi akiris tutmondan sukceson, estas tradukita en pli ol 57 lingvojn kaj eldonita en pli ol 70 landoj. En la jaro 1905<sup>a</sup> la aŭtoro ricevis Nobel-premion pri literaturo «pro eminentaj verkistaj atingoj en epika literaturo».

En 1933 sub la sama latina titolo aperis la esperanta traduko de la romano fare de Lidja Zamenhof' (1904–1942), la plej juna filino de d-ro Esperanto. Krom la evidenta arta valoro de la verko, tiu traduko prezentas grandan intereson filologian, ĉar la tradukistino fidele kaj kohere esperantigis la verbajn aspektojn de la originala teksto pollingva. Pli detale pri tio, kaj pri la problemo de nomoj propraj oni povas legi en la reta komentario de Sergio Pokrovskij.

En la pola originalo abundas latinaĵoj (komencante per la romanotitolo). Tamen Senkeviĉo multajn latinaĵojn uzas en asimilita (poligita) aŭ duonasimilita (transliterita) formo. Lidja Zamenhof' koherigis la tekston per konsekvenca latinigo. Ĉi tiu revizio koherigas inversmaniere, per esperantigo. Krome, en la reviziita eldono estas korektitaj tradukaj kaj lingvaj eraroj. La ŝanĝo en la tradukprincipo postulis ŝanĝon de la titolo. Tamen la verbosistemo de la verko restas netuŝita.

# Enhavtabelo

Parto unua . . . . .	.0008
Ĉapitro 1 <sup>a</sup> . . . . .	.0008
Ĉapitro 2 <sup>a</sup> . . . . .	.0032
Ĉapitro 3 <sup>a</sup> . . . . .	.0063
Ĉapitro 4 <sup>a</sup> . . . . .	.0068
Ĉapitro 5 <sup>a</sup> . . . . .	.0080
Ĉapitro 6 <sup>a</sup> . . . . .	.0086
Ĉapitro 7 <sup>a</sup> . . . . .	.0093
Ĉapitro 8 <sup>a</sup> . . . . .	.0138
Ĉapitro 9 <sup>a</sup> . . . . .	.0148
Ĉapitro 10 <sup>a</sup> . . . . .	.0159
Ĉapitro 11 <sup>a</sup> . . . . .	.0168
Ĉapitro 12 <sup>a</sup> . . . . .	.0187
Ĉapitro 13 <sup>a</sup> . . . . .	.0199
Ĉapitro 14 <sup>a</sup> . . . . .	.0214
Ĉapitro 15 <sup>a</sup> . . . . .	.0231
Ĉapitro 16 <sup>a</sup> . . . . .	.0239
Ĉapitro 17 <sup>a</sup> . . . . .	.0250
Ĉapitro 18 <sup>a</sup> . . . . .	.0264
Ĉapitro 19 <sup>a</sup> . . . . .	.0271
Ĉapitro 20 <sup>a</sup> . . . . .	.0287
Ĉapitro 21 <sup>a</sup> . . . . .	.0306
Ĉapitro 22 <sup>a</sup> . . . . .	.0319
Parto dua . . . . .	.0333
Ĉapitro 23 <sup>a</sup> . . . . .	.0333

Capitro 24 <sup>a</sup> . . . . .	.0345
Capitro 25 <sup>a</sup> . . . . .	.0360
Capitro 26 <sup>a</sup> . . . . .	.0371
Capitro 27 <sup>a</sup> . . . . .	.0388
Capitro 28 <sup>a</sup> . . . . .	.0402
Capitro 29 <sup>a</sup> . . . . .	.0416
Capitro 30 <sup>a</sup> . . . . .	.0433
Capitro 31 <sup>a</sup> . . . . .	.0443
Capitro 32 <sup>a</sup> . . . . .	.0453
Capitro 33 <sup>a</sup> . . . . .	.0471
Capitro 34 <sup>a</sup> . . . . .	.0479
Capitro 35 <sup>a</sup> . . . . .	.0485
Capitro 36 <sup>a</sup> . . . . .	.0498
Capitro 37 <sup>a</sup> . . . . .	.0514
Capitro 38 <sup>a</sup> . . . . .	.0519
Capitro 39 <sup>a</sup> . . . . .	.0523
Capitro 40 <sup>a</sup> . . . . .	.0536
Capitro 41 <sup>a</sup> . . . . .	.0548
Capitro 42 <sup>a</sup> . . . . .	.0560
Capitro 43 <sup>a</sup> . . . . .	.0574
Parto tria . . . . .	.0591
Capitro 44 <sup>a</sup> . . . . .	.0591
Capitro 45 <sup>a</sup> . . . . .	.0598
Capitro 46 <sup>a</sup> . . . . .	.0613
Capitro 47 <sup>a</sup> . . . . .	.0618
Capitro 48 <sup>a</sup> . . . . .	.0630
Capitro 49 <sup>a</sup> . . . . .	.0640
Capitro 50 <sup>a</sup> . . . . .	.0657

Ĉapitro 51 <sup>a</sup> . . . . .	.0667
Ĉapitro 52 <sup>a</sup> . . . . .	.0690
Ĉapitro 53 <sup>a</sup> . . . . .	.0698
Ĉapitro 54 <sup>a</sup> . . . . .	.0713
Ĉapitro 55 <sup>a</sup> . . . . .	.0723
Ĉapitro 56 <sup>a</sup> . . . . .	.0729
Ĉapitro 57 <sup>a</sup> . . . . .	.0766
Ĉapitro 58 <sup>a</sup> . . . . .	.0790
Ĉapitro 59 <sup>a</sup> . . . . .	.0802
Ĉapitro 60 <sup>a</sup> . . . . .	.0808
Ĉapitro 61 <sup>a</sup> . . . . .	.0820
Ĉapitro 62 <sup>a</sup> . . . . .	.0826
Ĉapitro 63 <sup>a</sup> . . . . .	.0842
Ĉapitro 64 <sup>a</sup> . . . . .	.0849
Ĉapitro 65 <sup>a</sup> . . . . .	.0855
Ĉapitro 66 <sup>a</sup> . . . . .	.0863
Ĉapitro 67 <sup>a</sup> . . . . .	.0879
Ĉapitro 68 <sup>a</sup> . . . . .	.0882
Ĉapitro 69 <sup>a</sup> . . . . .	.0887
Ĉapitro 70 <sup>a</sup> . . . . .	.0897
Ĉapitro 71 <sup>a</sup> . . . . .	.0901
Ĉapitro 72 <sup>a</sup> . . . . .	.0910
Ĉapitro 73 <sup>a</sup> . . . . .	.0912
Ĉapitro 74 <sup>a</sup> . . . . .	.0922
Epilogo . . . . .	.0933
Komentaro . . . . .	.0944
Bibliografio kaj mallongigoj . . . . .	.0944
Nomtabelo . . . . .	.0945

Glosaro . . . . .	0965
Latinaj vortoj kaj esprimoj. . . . .	.0974
Roma domo riĉula. . . . .	.0977

Henryk Sienkiewicz

**Kien ci iras?**

Romano el la tempo de Nerono

El la pola lingvo tradukis  
*Lidja Zamenhof*

La tradukon prilaboris  
*Sergio Pokrovskij*

# Parto unua

## Ĉapitro 1<sup>a</sup>

Petronio<sup>1</sup> vekiĝis ĉirkaŭ tagmezo, kaj kiel ordinare, tre laca. La antaŭan tagon li ĉeestis festenon ĉe Nerono<sup>2</sup>, daŭrintan ĝis malfrua nokto. De certa tempo lia sano komencis malboniĝi. Li mem diradis, ke matene li vekiĝas kvazaŭ rigida, nekapabla ordigi siajn pensojn. Sed matena bano kaj zorga masaĝado, farata de sklavoj lertaj en tio, iom post iom rapidigadis la cirkuladon de lia malrapidema sango, vigligadis lin, redonadis la konscion kaj refor-  
tigadis tiel, ke el la oleadejo,<sup>3</sup> t.e. la lasta bana fako, li elir-  
adis ankoraŭ kvazaŭ revivigita, kun okuloj brilantaj de  
spriteco kaj gajeco, reunigita, vivoplena, eleganta kaj tiel  
senegala, ke Otono<sup>4</sup> mem ne povus kompari sin kun li —  
kaj vera, kiel oni lin nomis — *arbiter elegantiarum*.<sup>5</sup>

<sup>1</sup> «**Petronio**. Latina satira verkisto (*C. Petronius Arbiter*, m. 65).» [PIV]

<sup>2</sup> **Nerono**<sup>z</sup> [PIV] — Romia imperiestro (54–68 p.K.).

<sup>3</sup> Latine *elæothesium* aŭ *oleotechium* — la parto de vaporbanejo, kie oni olivoleis la banantojn.

<sup>4</sup> *M. Salvius Otho* (32–69 p.K.) — ekstravaganca amiko de Nerono ĝis la jaro 58<sup>a</sup> kiam, puŝate de sia bela edzino *Popæa Sabina*, li konatigis ŝin kun tiu. Ŝi iĝis amorantino de Nerono, eksedziniĝis de Otono, kaj persvadis la imperiestron ekzili Otonon en la provincon Luzitania (la nuna Portugalio).

<sup>5</sup> Aŭtoritatulo pri belgusto kaj bonaj mondumaj manieroj.



La publikajn banejojn li vizitadis malofte — nur en esceptaj okazoj, se oni povis tie aŭdi iun mirindan retorikon, pri kiu oni parolis en la urbo, aŭ se en la efebejoj<sup>6</sup> okazis speciale interesaj sportokonkursoj. Cetere, en sia domo li havis propran banejon, kiun Celero, la fama kompaniano de Severo,<sup>7</sup> plivastigis por li, alikonstruis kaj aranĝis kun tiel eminenta belgusto, ke laŭ Nerono mem ĝi superis la imperiestran, kvankam la imperiestra banejo estis pli granda kaj aranĝita senkompare pli lukse.

Post tiu festeno, dum kiu, enuigite de arlekenado de Vatinio<sup>8</sup>, li partoprenis kun Nerono, Lukano<sup>9</sup> kaj Seneciono<sup>10</sup> la diskuton: ĉu virino havas animon — leviĝinte malfrue, li ĝuis, kiel ordinare, banon. Du grandegaj banistoj ĵus metis lin sur cipresan tablon, kovritan per neĝblanka egipta bisino<sup>11</sup>, kaj per manoj, trempitaj en aroma olivoleo, komencis froti lian belforman korpon — kaj li atend-

<sup>6</sup> *ephēbium* (lat.←gr.) — propre, gimnastikejo por efeboj (antikve, la junaj viroj 18–20 jarojn aĝaj). Ĉi tie temas pri baneja parto (pli ofte nomata *sphaeristerium*, «plikejo»), kie oni ekzercis antaŭ bano.

<sup>7</sup> Celero (lat. *Celer*), Severo (lat. *Severus*) — arĥitektoj kiuj post la brulego de Romo (64 p.K.) direktos konstruadon de la Ora Domo (vd [337]).

<sup>8</sup> **Titus Vatinius** — ŝuisto, poste bufono kaj kortegano de Nerono.

<sup>9</sup> **Lukano** [PIV] — latina poeto (*M.A. Lucanus*, 39–65).

<sup>10</sup> **Tullius Senecio** — amiko de Otono kaj kortegano de Nerono, poste ano de la Pizona konspiro.

<sup>11</sup> Lat. *byssus* — antikva ŝtofo, supozeble farita el lino aŭ kotono; ekz-e *El-iro*, 25:4; *Luko*, 16:19.

is kun fermitaj okuloj, ĝis la varmo de la *lakoniko*<sup>12</sup> kaj la varmo de iliaj manoj transiros en lin kaj forigos el li la lacecon.

Sed post certa tempo li ekparolis kaj, malferminte la okulojn, demandis pri la vetero kaj poste pri la gemoj, kiujn juvelisto Idomeno promesis alsendi hodiaŭ, ke li rigardu ilin. Montriĝis, ke la vetero estas belega, kun facila vento de la Albana montaro, kaj ke la gemojn oni ne alportis. Petronio denove duonfermis la okulojn kaj ordonis, ke oni transportu lin en la tepidejon<sup>13</sup> — kiam subite el post la kurteno montriĝis *nomenklatoro*<sup>14</sup>, anoncante viziton de juna Marko Vinicio, ĵus veninta el Anatolio<sup>15</sup>.

Petronio ordonis enlasi la gaston en la tepidejon, kien ankaŭ li mem sin direktis. Vinicio estis filo de lia pli aĝa fratino, kiu antaŭ jaroj edziniĝis al Marko Vinicio, konsulo en la tempo de Tiberio<sup>16</sup>. La juna Vinicio servis nune sub Korbulono<sup>17</sup> kontraŭ la partoj<sup>18</sup>, kaj post la fino de la

<sup>12</sup> Latine *laconicum* — «lakona» (= sparta) seka ŝvitejo en romia banejo.

<sup>13</sup> tepidejo [PIV] — lat. *tepidarium* — seka mezvarma (40–45 °C) ĉambro de vaporbanejo.

<sup>14</sup> Latine *nomenclator* — sklavo anoncanta la nomon de sia sinjoro aŭ la nomojn de alvenintaj gastoj.

<sup>15</sup> Lidja Z. tradukis laŭ la originalo: «Malgranda Azio». Tio estas anakronismo, tia nomo de la duoninsulo (lat. *Asia Minor*) unue aperis en la 5<sup>a</sup> jc.

<sup>16</sup> **Tiberio** [PIV] — la dua Romia imperiestro (m. 37 p.K.).

<sup>17</sup> *Cn. Domitius Corbulo* (ĉ. 7–67) — Romia militestro, konsulo de la jaro 39<sup>a</sup>. La plej grava militestro de la orienta kampanjo de Nerono.

milito revenis en la urbon. Petronio havis al li certan inklinton, preskaŭ amemon, ĉar Marko estis belega kaj atleta junulo, kaj samtempe li sciis konservi certan estetikan moderecon en diboĉo, kion Petronio aprezis super ĉio.

— Saluton al Petronio, — diris la juna viro, enirante per elasta paŝo en la *tepedejon*; — estu al ci favoraj ĉiuj diroj, precipe Asklepio<sup>19</sup> kaj Kipridino<sup>20</sup>, ĉar sub la protekto de ili ambaŭ nenio malbona povas al ci okazi.

— Bonvenon al ci en Romo, kaj dolĉa estu al ci ripozo post la milito, — respondis Petronio, etendante la manon el la ondaj faldoj de mola teksaĵo *karbasa*<sup>21</sup>, per kiu li estis ĉirkaŭvolvita. — Kiaj novaĵoj en Armenio, kaj ĉu, estante en Azio, ci trafis iam en Bitinion?

Petronio estis iam provincestro de Bitinio,<sup>22</sup> kaj plie, li administris ĝin energie kaj juste. Tio prezentis strangan kontraston kun la karaktero de tiu homo, fama pro sia molanimeco kaj plezuramo. Tial li volonte rememoradis tiun tempon, ĉar ĝi estis pruvo, kio li povus kaj sciis esti, se tio plaĉus al li.

<sup>18</sup> Nomo de gento: «(2) **Parto** (hist.) Ano de iama skita popolo, kiu fondis en Irano potenca imperion» [PIV].

<sup>19</sup> **Asklepio** [PIV] (mit.) — malnovgreka dio de medicino.

<sup>20</sup> **Kipridino** (en la pola originalo *Kipryda*) estas alnomo de Afrodito—Venero (naskiĝinta ĉe Kipro). Lidja Z tradukis per latinaĵo: *Cypria*.

<sup>21</sup> Latine *carbassus* — maldika lina ŝtofo.

<sup>22</sup> Tion mencias Tacito (*Analoj*, 16:18). *Bitinio* (gr. Βιθυνία, lat. *Bithynia*) estis nord-orienta regiono de Anatolio.

— Mi estis foje en Herakleo<sup>23</sup>, — respondis Vinicio. — Korbulono min sendis tien por venigi helpajn taĉmentojn.

— Ha, Herakleo! Mi konis tie unu knabinon el Kolĥido<sup>24</sup>, por kiu mi fordonus ĉiujn ĉi-tieajn eksedzinojn, ne esceptante Popean<sup>25</sup>. Sed tio estas malnova historio. Rakontu, prefere, kio okazas ĉe la Partuja limo. Envere enuigas min ĉiuj tiuj Valagaŝoj, Tiridatoj, Tigranoj<sup>26</sup> kaj ĉiuj tiuj barbaroj, kiuj, kiel diras la juna Aruleno<sup>27</sup>, hejme ankoraŭ iradas kvarpiede, kaj nur antaŭ ni ŝajnigas sin homoj. Sed nun oni multe parolas pri ili en Romo — almenaŭ tial, ke estas danĝere paroli pri io alia.

— Tiu ĉi milito malsukcesas, kaj sen Korbulono ĝi povus iĝi malvenka.

— Korbulono! je Bakĥo! Li estas vera dio de milito, vera Marso: granda militestro, kaj samtempe ekscitema, justa kaj malsaĝa. Mi amas lin almenaŭ tial, ke Nerono lin ti-

<sup>23</sup> Gr. Ἡράκλεια, lat. *Heraclea* — urbo en Bitinio, sur la bordo de la Nigra Maro.

<sup>24</sup> Antikva regiono ĉe la Nigra Maro, en la sud-okcidenta Kaŭkazio.

<sup>25</sup> *Poppæa* la pli Juna (30–65 p.K.), de post la jaro 63<sup>a</sup> *Poppæa Aŭgusta Sabina* — edzino de Nerono, eksedzino de Otono (vd [4]).

<sup>26</sup> **Valagaŝo la 1<sup>a</sup>** (latine *Vologæsus*) — Partuja reĝo (ĉ. 57–76). **Tiridato** — frato de Valagaŝo, en la jaro 66<sup>a</sup> Nerono faros lin reĝo de Armenujo. **Tigrano la 6<sup>a</sup>** — posteulo de Herodo la Granda, kiun Nerono faris reĝo de Armenujo en 58 p.K.

<sup>27</sup> *Q. Junius Arulenus Rusticus* (ĉ. 35–93 p.K.) — Roma senatano, amiko de Trazeo (noto [40]), stoikisto. Senkeviĉo (kaj Lidja Z) nomas lin *Arulanus*.

mas.

— Korbulo ne estas malsaĝa.

— Eble ci pravas, sed cetere tio estas indiferenta. Malsaĝeco, kiel diras Pirono,<sup>28</sup> neniel malsuperas saĝecon kaj neniel diferencas de ĝi.

Vinicio komencis rakonti pri la milito, sed kiam Petronio duonfermis la palpebrojn, la juna viro, vidante lian lacan kaj iom malgrasiĝintan vizaĝon, ŝanĝis la temon de la interparolo kaj kun certa zorgemo komencis demandi pri lia sano.

Petronio denove malfermis la okulojn.

Lia sano!... Ne. Li ne sentis sin sana. Li ankoraŭ ne atingis, vere, la staton de la juna Sizeno<sup>29</sup>, kiu tiagrade perdadis la sentopovon, ke alportate matene en banejon, li demandadis: «Ĉu mi sidas?» Sed li ne estis sana. Vinicio ĵus metis lin sub la protekton de Asklepio kaj Kipridino. Sed li, Petronio, ne fidis Asklepion. Oni eĉ ne scias, kies filo estas tiu Asklepio: ĉu de Arsinoo, aŭ de Koroniso; kaj se la patrino estas duba, kion diri pri la patro! Kiu povas

<sup>28</sup> «**Pirono**. La unua el la grandaj helenaj skeptikuloj (ĉ. 200 a.K.)» [PIV] (gr. Πύρων)

<sup>29</sup> **Sizeno** — probable, persono fikcia, kies nomo estas malsame skribata en diversaj eldonoj: *Sissena* [QP1], ***Sisenna*** [QPM], *Sysena* [QE]. Oni konas pli fruan historiiston *L. Cornelius Sisenna* (120–67 a.K.), kies traduko de grekaj fabeloj erotika-friponaj servis al Petronio kiel modelo por lia «Sattirikono».

nun garantii eĉ pri sia propra patro!

Ĉi tiam Petronio ekridis, post kio li daŭrigis:

— Verdire antaŭ du jaroj mi sendis en Epidaŭron tri dekduojn da vivaj turdoj kaj pokalon da oro; sed ĉu ci scias kial? Jen mi diris al mi: ĝi helpos aŭ ne helpos, sed certe ne malhelpos. Se homoj ankoraŭ oferdonas al dioj, mi tamen pensas, ke ĉiuj rezonas same, kiel mi. Ĉiuj, eble krom la mulistoj, kiuj sin dungas al vojaĝantoj ĉe la pordego Kapena<sup>30</sup>. Krom Asklepio mi havis rilatojn ankaŭ kun asklepianoj<sup>31</sup>, kiam lastjare mi malsanis iom je la veziko. Ili pasigadis por mi noktojn en templo. Mi sciis, ke ili estas trompistoj, sed mi diris al mi: ne domaĝe por mi! La mondo sin bazas sur trompo, kaj la vivo estas iluzio. Sed oni havu sufiĉe da saĝo por scii distingi inter iluzioj agrablaj kaj malagrablaj. Mi hejtigas mian hipokaŭston<sup>32</sup> per cedra ligno, surŝutita de ambro, ĉar mi preferas en la vivo belajn odorojn ol malbelajn. Koncerne Kipridinon, ankaŭ al kiu ci min konfidis, mi ĝuis ŝian favoron tiom, ke mi havas ŝirdolorojn en la dekstra kruro. Sed cetere ŝi estas

<sup>30</sup> Suda urbopordego de Romo (lat. *Porta Capena*), de kiu komenciĝas la Vojo Appia, kondukanta al Kapuo.

<sup>31</sup> Adeptoj de Asklepio; la greka Ἀσκληπιάδαι povas indiki personojn pretendantajn esti «Asklepiidoj», posteuloj de Asklepio (inter ili Aristotelo kaj Hipokrato); aŭ pastrojn de Asklepio kiuj (kiel ĉi-okaze) sonĝis en ties temploj por kuraci malsanulojn; aŭ ĝenerale kuracistojn.

<sup>32</sup> **hipokaŭsto** [PIV] — subplanka hejtosistemo.

bona diino! Mi supozas, ke nun, pli aŭ malpli baldaŭ, ankaŭ ci portos ofere blankajn kolombojn al ŝia altaro.

— Jes, — diris Vinicio. — Ne atingis min la sagoj de la partoj, sed trafis min pafado de Amoro — tute neatendite, kelkan distancon de la urba pordego.

— Je la blankaj genuoj de l' ĥaritoj!<sup>33</sup> Ci rakontos al mi tion en libera tempo.

— Mi venis ĝuste por peti cian konsilon, — respondis Marko.

Sed en tiu momento eniris *epilatoroj*<sup>34</sup>, kiuj sin ekokupis pri Petronio; kaj Marko, forĵetinte la tunikon, eniris en banujon kun mezvarma akvo, ĉar Petronio invitis lin al bano.

— Ha, mi eĉ ne demandas, ĉu cia amo estas reciproka, — diris Petronio, rigardante la junan korpon de Vinicio, kvazaŭ skulptitan el marmoro. — Se Lizipo estus cin vidinta, ci ornamus nun la Pordegon al Palatino kiel statuon de Herkulo en ties juneco.

La juna viro ridetis kontente kaj komencis subakviĝadi en la banujo, elplaŭdante ĉe tio abunde la varmetan akvon sur la mozaikon, prezentantan Heron en la momento, kiam ŝi petas Dormon pri endormigo de Zeŭso.

<sup>33</sup> **Ĥaritoj** (gr. Χάριτες) — malnovgrekaj diinoj de vivoĝojo kaj eleganteco (en Romo al ili respondis *la graciaj*).

<sup>34</sup> Latine *epilatores* — senharigistoj.

Petronio observis lin per kontenta rigardo de artisto.

Sed kiam Vinicio finis kaj laŭvice sin konfidis al la *epilatoroj*, eniris legisto kun bronza skatolo sur la ventro kaj paperaj rulaĵoj en la skatolo.

— Ĉu ci volas aŭskulti? — demandis Petronio.

— Se ĝi estas cia verko, volonte! — respondis Vinicio, — sed se ne, mi preferas interparoli. Poetoj nune kaptas homojn ĉe ĉiu stratangulo.

— Prave. Oni povas preterpasi neniun bazilikon, neniun banejon, neniun bibliotekon aŭ librovendejon, ne ekvidante poeton, gestantan kiel simio. Agripo<sup>35</sup>, veninte ĉi tien el la Oriento, prenis ilin por frenezuloj. Sed tia estas la nuna tempo. La imperiestro verkas versaĵojn, do ĉiuj lin imitas. Oni nur ne rajtas verki versaĵojn pli bonajn ol la imperiestraj, kaj pro tio mi iom timas pri Lukano ... Sed mi verkas proze, kaj regalas per mia prozo nek min mem, nek aliajn. Tio, kion la legisto estis legonta, estas la «Testamento» de tiu kompatinda Fabricio Vejentono.<sup>36</sup>

— Kial «kompatinda»?

— Ĉar oni diris al li, ke li imitu Odiseon kaj ne revenu

<sup>35</sup> «**Agripo**. Romana vira nomo» [PIV] (lat. *Agrippa*). Ĉi tie temas pri *M. Vipsanius Agrippa* (62–12 a.K.), bofilo de Aŭgusto, eminenta militestro kaj konstruinto de akvodukto kaj banejoj.

<sup>36</sup> Tacito rakontas (*Analoj*, 14:50), ke *Fabricius Vejento* verkis libron «*Codicilli*» (t.e. «Testamento»), plenan je atakoj kontraŭ eminentuloj. Nerono ordonis ekzili Vejentonon kaj forbruligi lian libron.



al la hejma sojlo ĝis nova decido. Tiu Odiseado estos por li tiom pli facila, ke lia edzino ne estas Penelopo. Mi ne bezonas diri al ci, ke tiu ago estis malsaĝa. Sed ĉi tie neniu konsideras aferojn alie ol supraĵe. Ĝi estas sufiĉe mizera kaj enuiga libro, kiun oni komencis pasie legi nur tiam, kiam la aŭtoro estis ekzilita. Nun oni aŭdas de ĉiuj flankoj: «Skandalo! Skandalo!» kaj povas esti, ke kelkajn historiojn Vejentono elpensis, sed mi, kiu konas la urbon, mi, kiu konas niajn *patrojn*<sup>37</sup> kaj niajn virinojn, certigas cin, ke ĉio tio estas pli pala ol la realo. Malgraŭ tio ĉiu nun serĉas en la libro sin mem kun timo, kaj konatojn kun plezuro. En la librejo de Aviruno cent skribistoj laŭdikte transskribas la libron — ĝia sukceso estas certa.

— Ĉu estas en ĝi cial aferetoj?

— Estas, sed la aŭtoro maltrafis, ĉar mi estas kune pli malbona kaj malpli vulgara ol li min prezentis. Vidu, ni jam delonge perdis la senton de tio, kio estas nobla aŭ malnobla, kaj al mi mem ŝajnas, ke, verdire, tiu diferenco ne ekzistas, kvankam Seneko<sup>38</sup>, Muzonio<sup>39</sup> kaj Trazeo<sup>40</sup>

<sup>37</sup> *patres* (lat.) — patroj, senatanoj.

<sup>38</sup> «**Seneko**<sup>z</sup>. Roma filozofo kaj tragediverkisto (*L.A. Seneca*, 4 a.K.—65)» [NPIV].

<sup>39</sup> *C. Musonius Rufus* (lat.) — roma stoikisto de la 1<sup>a</sup> jc, kiu instruis filozofion dum la regado de Nerono; Epikteto estis lia disĉiplo.

<sup>40</sup> *P. Clodius Thrax* *Pætus* (m. 66 p.K.) — Roma senatano, neformala ĉefo de la «stoikula opozicio» al Nerono, devigita de tiu sin mortigi.

pretendas, ke ili ĝin vidas. Al mi estas egale. Je Herkulo! Mi diras, kion mi pensas! Sed mi konservis tiun superecon, ke mi scias, kio estas malbela, kaj kio estas bela, kaj tion, ekzemple, nia kuprobarba poeto<sup>41</sup>, veturigisto, kantisto, dancisto kaj histriono ne komprenas.

— Mi kompatas tamen Fabricion! Li estis bona kamarado.

— Lin pereigis lia ambicio. Ĉiu lin suspektis, neniu bone sciis, sed li mem ne povis elteni kaj ĉiuflanken en sekreto disbabilis la aferon. Ĉu ci aŭdis la historion pri Rufeno?

— Ne.

— Ni do transiru en la *fridejon*<sup>42</sup>, kie ni senvarmiĝos kaj kie mi ĝin rakontos al ci.

Ili transiris en la *fridejon*, kie en la mezo ŝprucis fontano, kolorigita palroze kaj disportanta la aromon de violoj. Tie, sidiĝinte en per silko kovritaj niĉoj, ili komencis senvarmiĝi. Dum momento regis silento. Vinicio dum certa tempo medite rigardis bronzan faŭnon, kiu, fleksinte nimbos trans sian ŝultron, avide serĉis per la buŝo ŝian buŝon. Poste li diris:

<sup>41</sup> **kuprobarba poeto** — Poezio estis unu el la ĉefaj ŝatokupoj de Nerono. *Kuprobarba* estas la laŭvorta signifo de la kun nomo *Ahenobarbus* en la domo Domicia (lat. *gens Domitia*), al kiu denaske apartenis Nerono. Kaj la aspekto de Nerono konformis al tiu nomepiteto.

<sup>42</sup> Latine *frigidarium* — malvarmiga parto de vaporbanejo.

— Tiu ĉi pravas. Jen kio estas la plej bona en la vivo.

— Pli malpli! Sed krom tio ci amas militon, kiun mi ne ŝatas, ĉar en tendoj la ungoj fendiĝas kaj ĉesas esti rozkoloraj. Cetere ĉiu havas siajn plaĉojn. La Kuprobarba amas kanton, precipe sian propran, kaj la maljuna Skaŭro sian korintan vazon, kiu nokte staras apud lia lito, kaj kiun li kisas, se li ne povas dormi. Li forkisis jam ĝiajn randojn. Diru al mi, ĉu ci verkas versaĵojn?

— Ne. Mi neniam kunmetis tutan heksametron.

— Ĉu ci ludas liuton kaj kantas?

— Ne.

— Ĉu ci ĉarveturas?

— Mi partoprenis miatepe vetveturojn en Antioĥio, sed sen sukceso.

— Do mi estas tute trankvila pri ci. Kaj al kiu partio hipodroma ci apartenas?

— Al la Verduloj.

— Do mi estas tute trankvila — tiom pli, ke kvankam ci posedas verdire grandan havaĵon, tamen ne estas tiel riĉa, kiel Palaso<sup>43</sup> aŭ Seneko. Ĉar vidu — nun bone estas ĉe ni verki versaĵojn, kanti ĉe liuto, deklami kaj vetveturi en cirko, sed ankoraŭ pli bone, kaj precipe pli sendanĝere, estas ne verki versaĵojn, nek ludi, nek kanti, nek vetveturi

<sup>43</sup> «Palaso 1 (hist.) Vira nomo, i.a. de favorato kaj murdinto (kun Agripino) de Klaŭdio» [NPIV]. (Latine *Pallas* de la greka Πάλλας, Πάλλαντος.)

en cirko. Kaj plej bone estas scipovi admiri, kiam tiojn faras la Kuprobarba. Ci estas bela knabo, do eble nur tio povas cin minaci, ke al ci enamiĝos Popea. Sed ŝi estas tro sperta por tio. Amon ŝi ĝuis sufiĉe ĉe la du unuaj edzoj, kaj ĉe la tria ŝi aspiras ion alian. Ĉu ci scias, ke tiu malsaĝa Otono ĝis nun ŝin amegas freneze ... Li vagas tie inter la rokoj de Hispanujo kaj sopiras, kaj tiel li perdis la antaŭajn kutimojn kaj tiel ĉesis zorgi pri si mem, ke por aranĝi la harojn nun sufiĉas al li tri horoj tage. Kiu povus tion atendi, precipe de Otono.

— Mi komprenas lin, — diris Vinicio. — Sed lialoke mi farus ion alian.

— Kion nome?

— Mi formus fidelajn legiojn el la tieaj montaranoj. Bravaj soldatoj estas tiuj iberroj.

— Vinicio, Vinicio! Mi preskaŭ volus diri, ke ci ne kapablus je tio. Kaj ĉu ci scias, kial? Ĉar tiajn aferojn oni faras, sed ne parolas pri ili, eĉ kondiĉe. Koncerne min, mi lialoke ridus pri Popea, ridus pri la Kuprobarba, kaj mi formus legiojn ne el iberroj, sed el iberinoj. Eventuale mi verkus kelkajn epigramojn, kiujn mi cetere al neniu legus kiel la kompatinda Rufeno.

— Ci intencis rakonti al mi lian historion.

— Mi ĝin rakontos al ci en la *unktorio*<sup>44</sup>.

Sed en la *unctorio* la atenton de Vinicio okupis io alia, nome belegaj sklavinoj, kiuj tie atendis la sinbanintojn. Du el ili, negrinoj, similaj al mirindaj statuoj el ebono, komencis ŝmiri iliajn korpojn per delikataj aromaĵoj el Arabujo; aliaj, frigianinoj lertaj en kombado, tenis en la manoj, molaj kaj fleksemaĵoj, kiel serpentoj, poluritajn ŝtalajn spegulojn kaj kombilojn; kaj du knabinoj el Koso, similaj simple al diinoj, la vestofaldistinoj<sup>45</sup>, atendis ĝis venos la tempo por statusimile faldi la togojn de la sinjoroj.

— Je Zeŭso la Nubkolektanto! — diris Marko Vinicio. Kian elekton ci havas ĉi tie!

— Mi preferas elekton ol kolekton, — respondis Petronio. — Mia tuta domanaro<sup>46</sup> en Romo ne superas kvarcent homojn, kaj mi pensas, ke por persona priservado eble nur novriĉuloj bezonas pli multe.

— Pli belajn korpojn eĉ la Kuprobarba ne posedas, — diris Vinicio, disblovante la nazajn alojn.

Je tio ĉi Petronio respondis kun certa amika senzorgeco:

— Ci estas mia parenco, kaj mi estas nek tiel nekomplezema kiel Basso<sup>47</sup>, nek tiel pedanta, kiel Aŭlo Plaŭcio<sup>48</sup>.

<sup>44</sup> Latine *unctuarium* aŭ *unctorium* — latinecaj nomoj por tio, kio ĉi-supre [3] aperis sub la nomo *oleadejo*.

<sup>45</sup> Latine *vestiplica* — sklavino ordiganta faldojn de togo sur patricioj.

<sup>46</sup> En ĉi tiu prilaboraĵo tiu vorto respondas al lat. *familia*, la doma sklavaro.

<sup>47</sup> *Aŭfidius Bassus* — roma historiisto, epikurano, amiko de Seneko la pli

Vinicio, ekaŭdinte ĉi-lastan nomon, tuj forgesis pri la knabinoj el Koso, kaj vive levinte la kapon, demandis:

— Kial venis en cian penson Aŭlo Plaŭcio? Ĉu ci scias, ke mi, elartikiginte la brakon apud la Urbo, pasigis ĉe il dekkelkajn tagojn? Okazis, ke Plaŭcio alveturis en la momento de la akcidento, kaj vidante, ke mi tre suferas, kunprenis min en sian hejmon, kaj tie lia sklavo, kuracisto Meriono, min resanigis. Ĝuste pri tio mi volis kun ci paroli.

— Kial? Ĉu hazarde ci enamiĝis je Pomponia? Se jes, mi bedaŭras cin: virino nejuna kaj virta! Pli malbonan kombinson mi ne povas imagi. Brrr!

— Ne je Pomponia, aĥ ne! — diris Vinicio.

— Je kiu do?

— Se mi mem scius, je kiu? Sed mi eĉ ne scias certe ŝian nomon: *Ligia*, ĉu *Kallina*? Oni nomas ŝin hejme *Ligia*, ĉar ŝi devenas el la nacio de la ligioj<sup>49</sup>, sed ŝi havas sian barbaran nomon: *Kallina*. Stranga estas la domo de la Plaŭcioj: svarmoplana kaj senbrua, kiel la boskoj en Subiako<sup>50</sup>. Dum dekkelkaj tagoj mi ne sciis, ke tie loĝas diino.

aĝa.

<sup>48</sup> *Aŭlus Plaŭtius* — Romia politikisto kaj militisto, kiu grave rolis en la konkero de Britujo (la jaroj 43<sup>a</sup>–47<sup>a</sup>). Konsulo en la jaro 29<sup>a</sup>.

<sup>49</sup> Temas pri *lugioj* (lat. *lugii*, gr. Λοῦγιοί) kiuj loĝis en la okcidenta parto de la nuna teritorio de Pollando. Senkeviĉo sekvis la nun arkaikan germanan nomon *die Lygier*.

Sed foje, je tagiĝo, mi ekvidis ŝin sin lavi en la ĝardena fontano. Kaj mi ĵuras je la ŝaŭmo el kiu naskiĝis Afrodito, ke la radioj de la matenruĝo trabilis ŝian korpon. Mi pensis, ke kiam la suno leviĝos, ŝi solviĝos antaŭ mi en la lumo, kiel solviĝas ĉielruĝo. Poste mi ŝin vidis dufoje, kaj de tiam mi ne konas trankvilon, mi ne havas aliajn dezirojn, mi ne volas scii, kion povas doni al mi la urbo, mi ne volas virinojn, nek oron, mi ne volas korintajn kupraĵojn, nek sukcenon, nek perlamoton, nek vinon, nek festenojn, mi nur volas Ligian. Mi diras al ci sincere, Petronio, ke mi sopiras je ŝi, kiel la Dormo, prezentita sur la mozaiko en cia tepidejo, sopiris je Paziteo<sup>51</sup>, mi sopiras dum tutaj tagoj kaj noktoj.

— Se ŝi estas sklavino, aĉetu ŝin.

— Ŝi ne estas sklavino.

— Kio ŝi estas do? Liberigitino de Plaŭcio?

— Neniam estinte sklavino, ŝi ne povis esti liberigita.

— Sekve?

— Mi ne scias: reĝa filino, aŭ io simila.

— Ci ekinteresas min, Vinicio.

— Sed se ci volos min aŭskulti, mi kontentigos cian intereson. La historio ne estas tro longa. Ci eble persone konis Vanion<sup>52</sup>, la reĝon de la svevoj<sup>53</sup>, kiu, ekzilite el sia pa-

<sup>50</sup> *Sublacum*, *Subiacum*, itale *Subiaco*.

<sup>51</sup> Gr. Πασιθέα — la plej juna el la ĥaritoj.

trujo, dum longa tempo restadis en Romo, kaj eĉ famiĝis per feliĉa kubludado kaj per bona veturigado. Cezaro Druzo<sup>54</sup> ree surtronigis lin. Vanio, kiu estis efektive brava homo, en la komenco regis bone kaj sukcese militadis, sed poste li komencis rabi per ĉiuj manieroj, ne nur de la najbaroj, sed ankaŭ de la propraj svevoj. Tiam Vangio kaj Sido, liaj du nevoj kaj filoj de Vibilio, la reĝo de la hermanduroj, decidis devigi lin denove iri en Romon ... provi la feliĉon en kubludado.

— Mi memoras, tio estis en la tempo de Klaŭdio<sup>55</sup>, antaŭ nelonge.

— Jes! Eksplodis milito. Vanio helpvokis la jazigojn, kaj liaj simpatiaj nevoj la ligiojn, kiuj, aŭdinte ion pri la riĉaĵoj de Vanio kaj allogitaj per espero de milittrabaj, venis en tia nombro, ke la imperiestro Klaŭdio mem komencis timi pri la apudlima paco. Klaŭdio ne volis miksi sin en la militojn de la barbaroj, li tamen skribis al Atelio Histro<sup>56</sup>, kiu komandis la apuddanuban legion, ke li zorge atentu la sorton de la milito kaj ne permesu konfuzi nian pacon. Tiam Histro postulis de la ligioj, ke ili promesu ne

<sup>52</sup> Latine *Vannius* (regis en la jaroj 19–50 p.K.).

<sup>53</sup> Grupo da ĝermanaj triboj (latine *Suevi*, *Suebi*, *Suavi*, *Suevians*).

<sup>54</sup> **Drusus Julius Cæsar**, aŭ *Druzo la pli juna* (13 a.K. — 23 p.K.) estis filo kaj heredonto de imperiestro Tiberio (li tamen mortis pli frue ol Tiberio).

<sup>55</sup> **Klaŭdio**<sup>z</sup> [PIV] — Romia imperiestro (41–56 p.K.; lat. *Claŭdius*).

<sup>56</sup> Latina nominativo: *Atelius Hister*.



transpasi nian limon, kion ili ne nur konsentis, sed donis garantiulojn, inter kiuj troviĝis la edzino kaj filino de ilia militestro ... Ci scias ja, ke la barbaroj militiras kun siaj edzinoj kaj infanoj ... Kaj jen mia Ligia estas la filino de tiu militestro.

— Kiel ci eksciis tion?

— Aŭlo Plaŭcio mem al mi rakontis tion. La ligioj efektive ne transpasis tiam nian limon, sed la barbaroj venas, kiel uragano, kaj forkuras, kiel uragano. Tiel malaperis ankaŭ la ligioj kun siaj uraj kornoj sur la kapoj. Ili venkis la svevojn kaj jazigojn de Vanio, sed ilia reĝo peris, kaj ili foriris kun rabaĵoj, lasante la garantiulojn ĉe Histro. La patrino baldaŭ mortis, kaj ne sciante, kion fari pri la infano, Histro forsendis ĝin al la provincestro de la tuta Ĝermanujo, Pomponio. Tiu ĉi, fininte la militon kontraŭ la ĥattoj<sup>57</sup>, revenis Romon, kie, kiel ci scias, Klaŭdio permesis al li soleni la triumfon. La knabino paŝis tiam post la ĉaro de la venkinto, sed kiam la soleno finiĝis, siavice Pomponio ne sciis, kion fari pri ŝi, ĉar oni ne povis trakti la garantiulinon kiel militkaptiton, kaj fine li donis ŝin al sia fratino, Pomponia Grecina, la edzino de Plaŭcio. En ilia domo, kie ĉiuj estas virtaj, komencante de la gemastroj, kaj finante per dombirdoj en la birdejo, ŝi plenkreskis,

<sup>57</sup> La ĝermanoj (latine *Chatti*, germane *Chatten*) kiuj vivis en la nuna Hesio.

bedaŭrinde tiel virta, kiel Grecina mem, kaj tiel belega, ke eĉ Popea aspektus apud ŝi, kiel aŭtuna figo apud hesperidina pomo.

— Kaj?

— Kaj mi ripetas al ci, ke de kiam mi vidis, kiel la sunradioj trabilis ŝian korpon ĉe la fontano, mi enamiĝis je ŝi freneze.

— Ŝi estas do tiel diafana, kiel petromizo aŭ juna sardino?

— Ne ŝercu, Petronio, kaj se cin erarigas la facileco, kun kiu mi mem parolas pri mia pasio, sciu, ke sub helkolora vesto ofte profundaj vundoj sin kaŝas. Mi devas diri al ci ankaŭ, ke, revenante el Azio, mi dormis unu nokton en templo de Mopso<sup>58</sup> por havi aŭguran sonĝon. Kaj en la sonĝo aperis antaŭ mi Mopso mem kaj antaŭdiris, ke en mia vivo granda ŝanĝo okazos pro amo.

— Mi aŭdis Plinion<sup>59</sup> diri, ke li ne kredas je la dioj, sed kredas je sonĝoj, kaj eble li pravas. Malgraŭ miaj ŝercoj ankaŭ mi pensas fojfoje, ke efektive ekzistas nur unu dia estaĵo, pratempa, ĉiopova, krea — *Venus Genitrix*<sup>60</sup>. Ŝi kunigas la animojn, ŝi kunigas la korpojn kaj aĵojn. Eroso

<sup>58</sup> Greke Μόψος — heroo de la Troja milito, fondinto de orakolejo sciiganta la estontecon per sonĝoj.

<sup>59</sup> **Plinio** (lat. *Plinius*) **la maljuna** [PIV] — natursciencisto (23–79 p.K.).

<sup>60</sup> *Venus Genitrix* lat. [vĕnus ĝenitriks] — Venero la (pra)patrino.

eligis la mondon el ĥaoso. Ĉu li faris bone, tio estas alia demando, sed ĉar tiel estas, ni devas konfesi lian potencon, kvankam ni rajtas ne beni ĝin...

— Ha, Petronio, pli facile estas filozofi ol doni bonan konsilon.

— Diru al mi, kion ĝuste ci volas?

— Mi volas havi Ligian. Mi volas, ke miaj brakoj, kiuj nun ĉirkaŭas nur aeron, povu ĉirkaŭi ŝin kaj alpremi al la brusto. Mi volas spiri per ŝia spiro. Se ŝi estus sklavino, mi donus por ŝi al Aŭlo cent knabinojn kun piedoj blankigitaj per kalko, signe ke ili estas unuafoje vendataj. Mi volas havi ŝin en mia domo tiel longe, ĝis mia kapo estos blanka, kiel la pinto de Sorakto<sup>61</sup> en vintro.

— Ŝi ne estas sklavino, sed cetere ŝi apartenas al la domanaro de Plaŭcio, kaj ĉar ŝi estas forlasita infano, oni povas konsideri ŝin zorgatino. Plaŭcio povus ŝin cedi al ci, se li volus.

— Ci evidente ne konas Pomponian Grecinan. Cetere ili ambaŭ amas ŝin, kiel propran infanon.

— Pomponian mi konas. Vera cipreso. Se ŝi ne estus edzino de Aŭlo, oni povus ŝin dungigi kiel ploristinon. De la morto de Julia<sup>62</sup> ŝi ne demetis la nigran stolon<sup>63</sup>, kaj en-

<sup>61</sup> *Sorakto* (lat. Mons Soracte, it. Monte Soratte) — monto je 45 km norden de Romo.

<sup>62</sup> Temas pri kuzino de Pomponia Grecina, filino de Druzo (*Julia Drusi*

tute ŝi aspektas, kvazaŭ ŝi jam vive estus paŝanta sur kampo de asfodeloj<sup>64</sup>. Plie, ŝi estas *univira*<sup>65</sup>, do inter niaj virinoj, eksedziniĝantaj kvar- aŭ kvinfoje, ŝi estas samtempe fenikso. Sed aŭskultu! Ĉu ci aŭdis, ke la fenikso laŭdire vere elkoviĝis nun en la supra Egiptujo, kio okazas al ĝi ne pli ofte ol unufoje dum kvincent jaroj?

— Petronio, Petronio! Pri la fenikso ni babilu alifoj.

— Kion mi diru al ci, mia Marko. Mi konas Aŭlon Plaŭcion, kiu, kvankam mallaŭdas mian vivmanieron, havas al mi certan simpation, kaj eble eĉ estimas min pli ol aliajn, ĉar li scias, ke mi neniam estis denunciisto, kiel ekzemple Domicio Afro<sup>66</sup>, Tigeleno<sup>67</sup> kaj la tuta bando da amikoj de Ahenobarbo<sup>68</sup>. Krom tio, ne ŝajnigante min stotikulo, mi tamen plurfoje malaprobis tiajn agojn de Nerono, je kiuj Seneko kaj Burro<sup>69</sup> fermetis la okulojn. Se ci

---

*Cæsarís Filia*), ekzekutita sub Klaŭdio je la 43<sup>a</sup> jaro sekve de akuzo fare de agente de Mesalino. Dum la sekvaj 40 jaroj Pomponia ŝin funebris, kion oni rigardis defio al la imperiestra reĝimo.

<sup>63</sup> **stolo** [PIV] (lat. *stola*) — longa vesto de romaj patricinoj.

<sup>64</sup> T.e. en la regno de mortintoj.

<sup>65</sup> «Unuedza», t.e. solfoje edziniĝinta.

<sup>66</sup> *Cn. Domitius Afer* (m. 59 p.K.) — eminenta oratoro kaj senatano, fama pro siaj denuncoj.

<sup>67</sup> *C. Sophonius Tigellinus* (ĉ. 10–69 p.k.) — prefekto (la estro) de la pretoriana gvardio dum la regado de Nerono.

<sup>68</sup> *Ahenobarbus* (lat.) — laŭvorte «Kuprobarba», la familia kunnomo de Nerono (kp [41]).

<sup>69</sup> *Sextus Afranius Burrus* (m. 62) — prefekto de pretorianoj (51–62), dum

opinias, ke mi povas ion atingi por ci ĉe Aŭlo, mi estas preta servi al ci.

— Mi opinias, ke ci povas. Ci havas influon je li, kaj krom tio cia menso abundas je neelĉerpeblaj rimedoj. Se ci esplorus la situacion kaj parolus kun Plaŭcio...

— Ci trotaksas mian influon kaj spritecon, sed se en tio konsistas la afero, mi parolos kun Plaŭcio tuj, kiam ili revenos en la urbon.

— Ili revenis antaŭ du tagoj.

— Ni iru do en la triklinion<sup>70</sup>, kie nin atendas matenmanĝo, kaj poste, fortiĝinte, ni ordonos porti nin al Plaŭcio.

— Ĉiam ci estis kara al mi, — respondis vive Viniĉio, — sed nun mi simple starigos inter miaj laroj<sup>71</sup> cian statuon tiel belan, kiel ĉi tiu — kaj dediĉados al ĝi oferojn.

Dirinte tion, li sin turnis al la statuoj, kiuj ornamis unu tutan flankon de la aromplena halo.

Poste li aldonis:

— Je la lumo Heliosa! Se la dia Aleksandro estis simila al ci — oni ne miru pri Heleno!<sup>72</sup>

---

la unuaj jaroj de la Nerona regado kune kun Seneko mentoris la junan imperiestron.

<sup>70</sup> Latine *triclinium*, greke τρικλίνιον — manĝoĉambro kun tri trilokaj sofoj laŭantaj tri flankojn de kvadrata manĝotablo, sur kiuj oni duonkuŝis dum manĝado.

<sup>71</sup> **laroj** (lat.) — ĉe la romanoj, hejmaj diaĵoj protektantaj.

Kaj en tiu ekkrio estis tiom da sincereco, kiom da flato. Ĉar Petronio, kvankam pli aĝa kaj malpli atleta, estis eĉ pli bela ol Vinicio. La virinoj en Romo admiris ne nur lian flekseman menson kaj la guston, pro kiu li ricevis la titolon «arbitro de eleganteco» — sed ankaŭ lian korpon. Tiu admiro estis videbla eĉ sur la vizaĝoj de la du knabinoj el Koso, nun faldantaj lian togon, el kiuj unu, nomata Eŭniko,<sup>73</sup> kaŝe lin amanta, rigardis en liajn okulojn humile kaj admire.

Sed li tion ne atentis kaj, ridetinte al Vinicio, ekcitis responde la esprimon de Seneko pri la virinoj:

— *Animal impudens...*<sup>74</sup> k.t.p.

Kaj poste, metinte la brakon ĉirkaŭ liajn ŝultrojn, li elkondukis lin al la triklinio.

En la *unktorio* la du grekaj knabinoj, la frigianinoj kaj la du negrinoj komencis ordigi la vazetojn kun aromaĵoj. Sed en la sama momento el post la flankentirita kurteno de la *fridejo* montriĝis la kapoj de la banistoj kaj aŭdiĝis mallaŭta: «sss!» — kaj responde al tio unu el la grekinoj, la frigianinoj kaj la du etiopaj knabinoj, saltkurinte, rapidege malaperis post la kurteno. En la banejo komenciĝis

<sup>72</sup> Temas pri la Troja reĝido Pariso, alnome *Aleksandro*, kaj la bela *Heleno*, edzino de Menelao.

<sup>73</sup> Transskribo de la greka nomo Εὐνίκη; kp en la Londona Biblio: «via patrino Eŭnike» [2Tim 1:5].

<sup>74</sup> *animal impudens* (lat.) — besto senhonta.

momentoj de petolo kaj volupto, kiujn la inspektoro ne malpermesis, ĉar li mem ofte partoprenis en similaj diboĉoj. Cetere ankaŭ Petronio suspektis tion, sed ĉar li estis homo indulgema kaj nevolonte punadis, li rigardis tion per duonfermitaj okuloj.

En la *unktorio* restis sole Eŭniko. Dum certa tempo ŝi aŭskultis la voĉojn kaj ridojn, sin direktantajn for al la *lakoniko*; poste, preninte la tabureton inkrustitan per sukceso kaj eburo, sur kiu antaŭ momento sidis Petronio, ŝi alŝovis ĝin atente al lia statuo.

La *unktorio* plenis je sunlumo kaj koloroj, brilantaj de la ĉielarkaj marmoroj, per kiuj estis kovritaj la muroj. Eŭniko surpaŝis la tabureton — kaj, starante samalte kun la statuo, ŝi subite ĵetis la brakojn ĉirkaŭ ĝian kolon; poste ŝi forĵetis malantaŭen siajn orajn harojn, kaj, alŝovinte sian rozkoloran korpon al la blanka marmoro, komencis eksta-ze premi la buŝon al la malvarmaj lipoj de Petronio.

## Ĉapitro 2<sup>a</sup>

Post la tiel nomata «matenmanĝo», al kiu la du viroj sidiĝis tiam, kiam ordinaraj mortemuloj estis jam delonge tagmanĝintaj, Petronio proponis siesti. Laŭ li estis ankoraŭ tro frue por fari vizitojn. Estas verdire homoj, kiuj komencas viziti konatojn je sunleviĝo, kaj plie konsideras tiun kutimon malnova, roma. Sed li, Petronio, konsideras ĝin barbara. La posttagmezaj horoj estas la plej konvenaj, sed ne pli frue ol kiam la suno transiros al la templo de Jovo la Kapitola kaj komencos brili sur Forumon deflanke. En aŭtuno ordinare estas ankoraŭ tre varme, kaj la homoj volonte dormas post la manĝo. Intertempe agrable estas aŭskulti la murmuradon de la fontano en la atrio<sup>75</sup>, kaj post la nepra paŝmilo dormi iomete en la ruĝa lumo, penetranta tra purpura, duone surtirita velario<sup>76</sup>.

Vinicio konfesis liajn vortojn pravaj, kaj ili komencis promeni, en senzorga maniero parolante pri tio, kio okazas sur Palatino kaj en la urbo, kaj iom filozofiumante pri la vivo. Poste Petronio iris en dormoĉambron, sed li ne dormis longe. Duonhoron poste li eliris, kaj, ordoninte alporti al si verbenon, komencis ĝin flari kaj froti per ĝi

<sup>75</sup> Latine *atrium* — en Roma domo, interna korto kiu rolis kiel salono.

<sup>76</sup> Latine *velarium* — antikva speco de tolmarkezo, kurteno ŝirmanta kontraŭ sunradioj.



siajn manojn kaj tempiojn.

— Ci ne imagas, — li diris, — kiel tio vigligas kaj freŝigas. Nun mi estas preta.

Portilo atendis jam delonge, do ili sidiĝis kaj ordonis porti sin al la strato Patricia, al la domo de Aŭlo. La domo de Petronio situis sur la suda deklivo de Palatino, apud la t.n. Karinoj<sup>77</sup>, kaj tiel la plej mallonga vojo estus malsupre de Forumo, sed ĉar Petronio volis ĉe tiu okazo viziti la juveliston Idomeno, li ordonis, ke oni portu ilin tra la strato Apolona kaj Forumo al la Fia strato<sup>78</sup>, ĉe kies angulo estis multegaj ĉiuspecaj vinejoj.

Grandegaj negroj levis la portilon kaj ekiris, antaŭate de sklavoj, nomataj *kuristoj*<sup>79</sup>. Petronio dum certa tempo silente levadis siajn manojn, aromajn per verbeno, al la nazo, kaj ŝajnis mediti pri io. Post momento li diris:

— Venis al mi la ideo, ke se cia arbara nimfo ne estas sklavino, ŝi povus forlasi la domon de Plaŭcio kaj translokiĝi en la cian. Ci ĉirkaŭigus ŝin per amo kaj surŝutus per riĉaĵoj, kiel mi mian adoratan Ĥrizotemison<sup>80</sup>, kiu, inter ni

<sup>77</sup> Latine *Carinæ* — aristokrata kvartalo en la sudokcidenta parto de Romo, inter Palatino kaj Eskvilino.

<sup>78</sup> Latine *Vicus Sceleratus*, tiel nomita ĉar tie la pli juna filino de Servio Tullio, reĝo de Romo, surveturis en ĉaro la kadavron de sia ĵus murdita patro kaj revenis reĝino makulite de lia ŝprucinta sango.

<sup>79</sup> Latine *pedisequi*.

<sup>80</sup> **Ĥrizotemiso**, greke Χρυσόθεμις — inomo de pluraj personoj de la greka mitaro. Senkeviĉo uzas la poligitan formon *Chryzotemis*, Lidja Z.

dirante, tedas min jam almenaŭ same, kiel mi ŝin.

Marko skuis la kapon.

— Ne? — demandis Petronio. — En plej malbona okazo la afero venos antaŭ la imperiestron, kaj ci povas esti certa, ke eĉ nur dank' al mia influo nia Kuprobarba favorus cian flankon.

— Ci ne konas Ligian, — respondis Vinicio.

— Lasu do min demandi, ĉu ci ŝin konas pli ol laŭvide? Ĉu ci parolis al ŝi? Ĉu ci konfesis al ŝi cian amon?

— Mi vidis ŝin unue ĉe la fontano, kaj poste mi ankoraŭ dufoje renkontis ŝin. Memoru, ke dum mia restado en la domo de Aŭlo mi loĝis en flanka pavilono, destinita por gastoj, kaj, havante elartikigitan brakon, mi ne povis partopreni la komunajn manĝojn. Nur vespere, antaŭ la tago, por kiu mi anoncis mian forveturon, mi renkontis Ligian ĉe la vespermanĝo — kaj mi povis diri al ŝi eĉ ne unu vorton. Mi devis aŭskulti Aŭlon, kiu rakontis pri siaj venkoj en Britujo, kaj poste pri la ruino de la malgrandaj bienoj en Italujo, kiun ankoraŭ Licinio Stolono<sup>81</sup> penis kontraŭagi. Entute mi ne scias, ĉu Aŭlo kapablas paroli pri io alia, kaj ne pensu, ke ni sukcesos tion eviti, se nur ci ne

---

ĝin latinigas: *Chrysothemis*.

<sup>81</sup> C. *Licinius Calvus Stolo* — popoltribunuso, en la jaro 367<sup>a</sup> a.K. kune kun Lucio Sekstio Laterano akceptigis leĝojn favorajn al plebo kaj kamparanoj.

preferas aŭskulti pri la malharditeco de la nuna tempo. Ili havas en siaj birdejoj fazanojn, sed ne manĝas ilin, akceptinte la principon, ke formanĝo de ĉiu fazano proksimigas la finon de la Roma potenco. La duan fojon mi renkontis ŝin apud ĝardena cisterno; ŝi tenis en la mano ĵus elŝiritan kanon, kies tufan finon ŝi trempis en la akvo kaj surŝprucis la iridojn kreskantajn ĉirkaŭe. Rigardu miajn genuojn. Je la ŝildo de Heraklo, mi diras al ci, ke ili ne tremis, kiam kontraŭ niajn maniplojn<sup>82</sup> iris, muĝante, la hordoj da partoj — sed ili tremis ĉe tiu cisterno. Kaj konfuzita, kiel infano, kiu ankoraŭ portas *bulaon*<sup>83</sup> ĉe la kolo, nur per la okuloj mi petegis kompaton, longe ne povante eldiri eĉ vorton.

Petronio rigardis lin kun certa envio.

— Feliĉulo! — li diris, — eĉ se la mondo kaj la vivo estas plej malbonaj, restos en ili unu eterna bono — la juneco!

Kaj post momento li demandis.

— Ĉu ci alparolis ŝin?

— Jes. Rekonsciiginte iom, mi diris, ke mi revenas el Azio, ke mi elartikigis la brakon apud la urbo kaj multe

<sup>82</sup> **maniplo** (lat. *manipulus*) — taktika unuo de romia armeo, konsistanta el 120–200 homoj (aŭ 2 centurioj).

<sup>83</sup> Latine *bulla* — knaba medaliono kun amuleto, ofte en formo de ora globeto aŭ koro.

suferis; sed nun, kiam mi devas forlasi tiun gastaman domon, mi vidas, ke suferado ĉi tie pli valoras ol ĝojo aliloke, malsano pli ol aliloke sano. Ankaŭ ŝi estis konfuzita; ŝi klinis la kapon kaj aŭskultis miajn vortojn desegnante ion per kano sur la safrana sablo. Poste ŝi levis la okulojn, poste ankoraŭfoje rigardis tiujn faritajn signojn, poste ankoraŭfoje min, kvazaŭ volante ion demandi — kaj subite ŝi forkuris, kiel hamadriado<sup>84</sup> de malsprita faŭno.

— Ŝi certe havas belegajn okulojn.

— Kiel maro — kaj mi dronis en ili, kiel en maro. Kredu al mi, ke Arĥipelago<sup>85</sup> estas malpli blua. Momenton poste alkuris la malgranda Plaŭcio kaj komencis ion demandi. Sed mi ne komprenis, kion li diris.

— Ho Ateno! — ekkriis Petronio, — forprenu la kovraĵon, per kiu Eroso kovris la okulojn de ĉi tiu knabo — aŭ li rompos al si la kapon kontraŭ kolono en la templo de Venero.

Kaj li sin turnis al Vinicio:

— Ho, ci printempa burĝono sur la arbo de la vivo, ci unua verda branĉeto de vinberujo! Mi devus, anstataŭ al Plaŭcio, portigi cin al Gelocio, kiu havas lernejon por knaboj, ne havantaj scion pri la vivo.

— Kion ĝuste ci volas de mi?

<sup>84</sup> «Nimfo, kiu naskiĝis, vivis kaj mortis kun sia unuanima arbo» [PIV].

<sup>85</sup> Antikva nomo de la Egea Maro [PIV].

— Kaj kion ŝi desegnis sur la sablo? Ĉu ne la nomon de Amoro, ĉu ne koron, trapafitan per lia sago, aŭ ion similan, laŭ kio ci povus konjekti, ke satirusoj jam flustris en la orelon de tiu nimfo diversajn sekretojn de la vivo? Kiel ci povis ne rigardi tiujn signojn?

— De pli longe mi portas togon ol ci pensas, — diris Vinicio, — kaj antaŭ ol alkuris la malgranda Aŭlo, mi atente rigardis tiujn signojn. Mi ja scias, ke en Grekujo kaj en Romo knabinoj ofte skribas sur sablo konfesojn, kiujn ne volas eldiri iliaj buŝoj ... Sed divenu, kion ŝi desegnis?

— Se ion alian ol mi diris, mi ne divenos.

— Fiŝon.

— Kion ci diras?

— Mi diras: fiŝon. Ĉu ĝi devis signifi, ke en ŝiaj vejnoj ĝis nun malvarma sango fluas? — mi ne scias! Sed ci, kiu min nomis printempa burĝono sur la arbo de la vivo, scios sendube klarigi tiun signon pli bone?

— Pri tia afero, karulo, prefere demandu Plinion. Li havas scion pri la fiŝoj. Se la maljuna Apicio<sup>86</sup> vivus ankorau, eble ankaŭ li povus ion diri al ci pri tio, ĉar li formangis dum sia vivo pli da fiŝoj ol povas enteni samtempe la Neapola golfo.

<sup>86</sup> *M. Gabius Apicius* — duonmita roma frandemulo de la epoko Tiberia. Sub lia nomo estis publikigita fama libro kulinara.

Sed la plua interparolo rompiĝis, ĉar oni enportis ilin en svarmoplenajn stratojn, kie ĝin malhelpis la homa brado.

Tra la strato Apolona ili sin direktis al la Roma Forumo<sup>87</sup>, kie en bela vetero, antaŭ subiro de la suno, kunvenadis amasoj da senfaremaj urbanoj por promeni inter la kolonoj, rakonti novaĵojn kaj aŭskulti ilin, vidi eminentulojn portatajn en portiloj, fine eniri vendejojn de juvelistoj, librovendejojn, negocejojn, kie oni ŝanĝadis monon, vendejojn de ŝtofoj, de bronzaĵoj, kaj ĉiajn aliajn, kiuj trovis sin amase en la domoj, okupantaj la flankon de la placo kontraŭ Kapitolo.

La duono de Forumo, kuŝanta senpere sub la citadelaj abruptaĵoj, estis jam dronanta en ombro, dum la kolonoj de la pli alte starantaj temploj oris ankoraŭ en lumo kaj bluo. Tiuj, kiuj kuŝis pli malalte, ĵetadis longformajn ombrojn sur la marmorajn platojn, kaj ĉie ili estis tiel multaj, ke la rigardo inter ili perdis la vojon, kiel en arbaro.

Ŝajnis, ke tiuj konstruaĵoj kaj kolonoj kvazaŭ sufokas sin unuj inter aliaj. Ili levis sin en tavoloj, vico super vico, tendis sin dekstren kaj maldekstren, atakis la deklivojn, premis sin al la citadela murego aŭ unuj al aliaj, simile al pli kaj malpli grandaj, pli kaj malpli dikaj, orkoloraj kaj

<sup>87</sup> Latine *Forum Romanum*, aŭ simple *Forum* situas sur la sud-okcidenta deklivo de Kapitolo.

blankaj trunkoj, jen florantaj sub la arĥitravoj per akantaj floroj, jen volvitaj en jonstilajn kornojn, aŭ finitaj per simpla, doria kvadrato. Super tiu arbaro brilis koloraj triglifoj, el timpanoj elstaradis skulptitaj figuroj de dioj, de frontonoj flugilhavaj kvadrigoj kvazaŭ volis levi sin en la aeron, en tiun bluan, kiu flugpendis trankvile super tiu urbo de temploj. En la mezo de la placo kaj rande fluis rivero da homoj: amasoj promenis sub la arkadoj de la baziliko de Julio Cezaro, amasoj sidis sur la ŝtuparo de Kastoro kaj Polukso kaj svarmis apud la templeto de Vesto, similaj sur tiu grandega marmora fono al diverskoloraj aroj da papilioj aŭ skaraboj. De supre, per la grandegaj ŝtupoj, flanke de la templo dediĉita *Jovi optimo maximo*<sup>88</sup>, alfluadis novaj ondoj. Ĉe Rostroj<sup>89</sup> oni aŭskultis iujn hazardajn parolantojn; tie kaj ie aŭdiĝis ekkrioj de stratvendistoj, vendantaj fruktojn, vinon aŭ akvon miksitajn kun figsuko, de trompisto, rekomendantaj mirindajn kuracilojn, de aŭguristoj, trovistoj de kaŝitaj trezoroj, klarigistoj de sonĝoj. Kelkloke kun la bruo de interparoloj kaj vokoj miksis sin sonoj de sistro, de egipta *sambiko*<sup>90</sup> aŭ de grekaj flutoj. Kelkloke malsanuloj, piuloj aŭ ĉagrenitoj portis

<sup>88</sup> «Al Jovo la plej bona, la plej granda» (lat.).

<sup>89</sup> «**Rostroj** (hist.) Tribuno sur la Roma forumo, ornamita de ŝiprostroj» [PIV].

<sup>90</sup> **sambiko** (gr. σαμβύκη, lat. *sambuca*) — muzikilo, triangula harpo.

oferojn en templojn. Inter la homoj, sur la ŝtonaj platoj, amasiĝadis aretoj da kolomboj, avidaj je la oferaĵoj grajnoj, similaj al moviĝemaj, diverskoloraj kaj malhelaj makuloj, foje leviĝante supren kun laŭta flugilklakado, kaj jen falante sur lokojn, liberigitajn de la homamaso. De tempo al tempo la svarmantaj aroj disiĝadis antaŭ portilo, en kiu oni vidis subtilan virinan vizaĝon aŭ kapon de senatano aŭ kavaliro, kun trajtoj kvazaŭ rigidaj kaj lacaj de vivpenado. La diverslingva amaso laŭte ripetadis iliajn nomojn, aldonante kromnomojn, mokojn aŭ laŭdojn. Inter senordaj grupoj de tempo al tempo trapuŝadis sin, marŝante mezurpaŝe, taĉmentoj da soldatoj aŭ *vigiloj*<sup>91</sup>, gardantaj la stratan ordon. La grekan lingvon oni aŭdis ĉirkaŭe same ofte, kiel la latinan.

Vinicio, kiu jam longe ne estis en la Urbo, rigardis kun certa scivolo tiun homan svarmantaron kaj tiun Roman Forumon, regantan la ondaron de la mondo, kaj samtempe tiel de ĝi superverŝitan, ke Petronio, kiu penetris la penson de sia kunulo, nomis ĝin «la nesto de *kviritoj* — sen *kviritoj*». Efektive, la indiĝena elemento preskaŭ perdis sin en tiu amasego, konsistanta el ĉiuj nacioj kaj rasoj. Oni vidis tie etiopojn, blondharajn grandegulojn el la malproksima Nordo, britojn, gaŭlojn kaj ĝermanojn, obli-

<sup>91</sup> Latine *vigiles urbani* — Urbaj gardistoj (policianoj) kaj fajresingistoj.



kvokulajn loĝantojn de Seriko<sup>92</sup>, homojn el apud Eŭfrato kaj homojn el apud Induso, kun barboj pentritaj brikkolore, sirianojn el apud la bordoj de Oronto, kun okuloj nigraj kaj dolĉaj, sekajn, kiel osto, loĝantojn de la arabaj dezertoj, kavbrustajn judojn, egiptojn kun eterna indiferenta rideto sur la vizaĝoj, kaj numidojn, kaj afrikanojn, grekojn el Greklando, kiuj egale kun la romanoj regis la Urbon, sed regis per scienco, arto, saĝo kaj ruzo, grekojn el la insuloj kaj el Anatolio, kaj el Egiptujo, kaj el Italujo, kaj el Narbona Gaŭlujo. En la amaso da sklavoj kun truitaj oreloj ne mankis ankaŭ liberaj, nenifarantaj indiĝenoj, kiujn la imperiestro amuzis, nutris kaj eĉ vestis, kaj liberaj fremdlandanoj, kiujn logis en la grandegan urbon facileco de la vivo kaj esperoj je favoro de Fortuno; ne mankis stratvendistoj kaj pastroj de Serapo kun palmaj branĉoj en la manoj, kaj pastroj de Izido, sur kies altarojn oni portis pli da oferoj ol en la templon de Kapitola Jovo, — kaj pastroj de Cibelo<sup>93</sup>, tenantaj en la manoj orajn rizherbojn, kaj pastroj de migrantaj dioj, kaj orientaj dancistinoj kun helkoloraj mitroj, kaj vendistoj de amuletoj, kaj dresistoj de serpentoj, kaj ĥaldeaj magiistoj, kaj fine homoj sen okupo, kiuj ĉiusemajne venadis peti grenon el la apudti-

<sup>92</sup> Lat. *Serica* (Senkeviĉo skribis *Sericum*) — lando de silkaĵoj, t.e. Ĉinio.

<sup>93</sup> **Cibelo**, pli ĝuste *Kibelo* (gr. Κυβέλη) — Frigia diino, patrino de la dioj, akceptita en la malnovgrekan kaj Roman panteonojn.

beraj grenejoj, batalis pro loteriaj biletoj en cirkoj, pasigadis noktojn en senĉese falantaj domoj en la transtibera<sup>94</sup> kvartalo, kaj tagojn sunajn kaj varmajn en kriptoportikoj<sup>95</sup>, en malpuraj manĝejoj en Suburo<sup>96</sup>, sur la ponto Milvia aŭ antaŭ palacetoj de riĉuloj, kie de tempo al tempo oni ĵetadis al ili restaĵojn, lasitajn post manĝo de sklavoj.

Petronio estis bone konata al tiuj amasoj. La orelojn de Vinicio atingadis senĉese: «*Hic est!*»<sup>97</sup>. Oni amis lin pro lia malavareco, kaj lia populareco kreskis, de kiam oni eksciis, ke li pledis antaŭ la imperiestro kontraŭ la mortkondamno, verdiktita al la tuta domanaro, t.e. ĉiuj, sendiference de la sekso kaj aĝo, sklavoj de prefekto Pedanio Sekundo<sup>98</sup>, tial, ke unu el ili mortigis tiun kruelulon en momento de malespero. Petronio verdire laŭte ripetadis, ke tio estis al li indiferenta, kaj ke li pledis antaŭ la imperiestro nur private, kiel *arbiter elegantiarum*, kies estetikajn sentojn indignigis tiu barbara buĉo, inda je iaj scitoj, ne je romanoj. Malgraŭ tio la popolo, kiu indignis pro la buĉo,

<sup>94</sup> «Situantu sur la dekstra bordo de Tiberu» [NPIV].

<sup>95</sup> *cryptoporticus* (lat.) — trapasejo, koridoro, galerio por transpasi domegon.

<sup>96</sup> Vigla malriĉula kaj misfama urbokvartalo (lat. *Subura, Suburra*). Ĝi situis inter la montetoj Kvirinalo, Viminalo kaj Eskvilino.

<sup>97</sup> *Hic est!* [hik est] (lat.) — Ĉi-okaze: «Jen li!».

<sup>98</sup> *Lucius Pedanius Secundus* (m. 61 p.K.) — senatano, vickonsulo en 43 p.K., urbestro (prefekto) de Romo ekde la jaro 56<sup>a</sup>. Pikmortigita de sia sklavoj.

amis de tiu tempo Petronion.

Sed li ne atentis tion. Li memoris, ke ĉi tiu popolo amis ankaŭ Britanikon<sup>99</sup>, kiun Nerono venenis, kaj Agripinon<sup>100</sup>, kiun li ordonis murdi, kaj Oktavian, kiun oni sufokis sur *Pandatario*<sup>101</sup>, antaŭe malferminte ŝiajn vejnojn en varmega vaporo, kaj Rubelion Plaŭton<sup>102</sup>, kiu estis ekzilita, kaj Trazeon, al kiu ĉiu morgaŭo povis alporti mortverdikton. La amon de la popolo oni povis pli ĝuste konsideri malbona aŭguro, kaj la skeptika Petronio estis superstiĉa. La amason li malestimis duoble: kiel aristokrato kaj kiel estetikulo. Homoj, odorantaj rostitajn fabojn, kiun ili portis ĉebruste, kaj krom tio senĉese raŭkaj kaj ŝvitantaj de morao-ludado<sup>105</sup> ĉe stratanguloj kaj peristiloj, ne indis, antaŭ liaj okuloj, la nomon de homoj.

Respondante do nek aplaŭdojn, nek kisojn, de tie kaj ie sendatajn al li per gestoj, li rakontis al Marko la aferon de Pedanio, mokante ĉe tio la ŝanĝemon de la strata aĉul-

<sup>99</sup> *Ti. Claudiŭs Cæsar Britannicus* (41–55 p.K.) — filo de imperiestro Klaŭdio kaj Mesalino.

<sup>100</sup> «**Agripino**. Virina nomo, i.a. de la patrino de Nerono.» [NPIV] (lat. *Agrippina*)

<sup>101</sup> Insulo apud la Kalabria marbordo, ekzilejo; nun la italia *Ventotene*.

<sup>102</sup> *C. Rubellius Plaŭtus* (33–62 p.K.) — Roma nobelo, kiu per sia patrino parenis kun la Julia dinastio.

<sup>105</sup> **morao** [PIV], lat. *micatio* — Hazardudo, en kiu ludanto devas diveni nombron de la fingroj, elstreĉitaj sammomente de ĉiuj kunludantoj. Petro-  
nio ĝin mencias en sia «Satirikono».

aro, kiu, tagon post la danĝera ekscito, aplaŭdis Neronon, traveturantan al la templo de Jovo Statoro<sup>106</sup>. Sed antaŭ la librovendejo de Aviruno li ordonis halti, kaj, elirinte, aĉetis multornaman manuskripton, kiun li transdonis al Vinicio.

— Jen donaco por ci, — li diris.

— Dankon! — respondis Vinicio.

Poste, rigardinte la titolon, li demandis:

— «Satirikono»<sup>107</sup>? Io nova. Kiu ĝin verkis?

— Mi. Sed mi ne volas imiti Rufenon, kies historion mi intencis al ci rakonti, nek Fabricion Vejentonon: tial neniu tion scias, kaj ci al neniu diru.

— Ci ja diris, ke ci ne verkas versaĵojn, — diris Vinicio, — kaj ĉi tie mi vidas prozon, dense interplektitan kun ili.

— Kiam ci legos, atentu speciale la festenon ĉe Trimalĥiono. Koncerne versaĵojn — ili naŭzas min, de kiam Nerono verkas eposon. Vidu, Vitelio<sup>108</sup>, volante senpezigi la stomakon, uzas eburan bastoneton, kiun li enŝovas en la gorgon; aliaj helpas sin per fenikopteraj plumoj, trempit-

<sup>106</sup> *Jovi Statori templum* (lat.) — templo dediĉita al Jovo la haltiganto de fuĝantoj, savanto.

<sup>107</sup> Lat. *Satyricon* — satira verko de Petronio Arbitro.

<sup>108</sup> A. **Vitellius Germanicus** (15–69 p.K.) — manĝegemulo, kortegano de Kaligulo, Klaŭdio kaj Nerono; onta imperiestro (dum 8 monatoj) en «la 4-imperia jaro» (69 p.K.).

aj en olivoleo aŭ timiana dekoktaĵo — kaj mi legas poezi-  
aĵojn de Nerono — kaj la efiko estas tuja. Mi povas ilin  
poste laŭdi, se ne kun pura konscienco, almenaŭ kun pura  
stomako.

Tion dirinte, li haltigis la portilon antaŭ la vendejo de  
la juvelisto Idomeno, kaj, priparolinte kun li la aferon pri  
la gemoj, ordonis porti la portilon rekte al la domo de Aŭ-  
lo.

— Envoje mi rakontos al ci, por montri kion signifas  
la aŭtora ambicio, la historion pri Rufeno.

Sed antaŭ ol li ĝin komencis, ili eniris sur la straton  
Patrician kaj baldaŭ troviĝis antaŭ la hejmo de Aŭlo. Juna  
kaj fortstatura *janitor*<sup>109</sup> malfermis al ili la pordon kondu-  
kantan al *ostium*<sup>110</sup>; pigo, fermita en kaĝo pendanta super  
la pordo, krie salutis ilin per la vorto *Salve!*<sup>111</sup>

Trapasante el la vestiblo en la proprasencan atrion,  
Vinicio diris:

— Ĉu ci rimarkis, ke la pordisto ĉi tie estas sen katen-  
oj?

— Ĝi estas stranga domo, — respondis duonvoĉe Pe-  
tronio. — Ci scias verŝajne, ke oni suspektis Pomponian  
Grecinan pri konfesado de orienta superstiĉo, kiu konsist-

<sup>109</sup> *janitor* (lat.) — pordisto.

<sup>110</sup> *ostium* (lat.) — pord(eg)o, enirejo.

<sup>111</sup> *salve!* (lat.) — saluton!

as en adorado de iu *Hresto*<sup>112</sup>. Ŝajnas, ke tiun servon faris al ŝi Krispinilla<sup>113</sup>, kiu ne povas pardoni al Pomponia, ke unu edzo sufiĉis al ŝi por la tuta vivo. — *Univira!*... Eĉ plado da agarikoj el Noriko<sup>114</sup> ne estas hodiaŭ tia maloftaĵo en Romo. Ŝi estis juĝata de hejma tribunalo.

— Ci pravas, ke ĝi estas stranga domo. Mi rakontos al ci poste, kion mi ĉi tie aŭdis kaj vidis.

Dume ili eniris la atrion. La sklavo ĝin estranta, la atriestro, sendis alian, nomatan *nomenklatoro*, por anonci la alvenon de la gastoj, kaj samtempe servistoj alŝovis al ili seĝojn kaj piedbenketojn. Petronio, kiu, imagante, ke en ĉi tiu severa domo regas ĉiama malgajeco, neniam antaŭe estis ĉi tie, nun rigardis ĉirkaŭen kun certa miro kaj kvazaŭ kun seniluziigo, ĉar la atrio impresis pli ĝuste gaje. De supre, tra granda malfermaĵo, enfaladis kolono da hela lumo, splitanta sin en mil fajrerojn sur fontano. Kvadratan basenon kun fontano en la mezo, nomatan *pluvujo*

<sup>112</sup> La vorto «Kristo» devenas el la greka Χριστός /*ĥristós*/, «(sankt)oleito», laŭvorta grekigo de la hebrea «maŝiaĥ» (t.e. «mesio»). Tiu nocio ne estas konata ekster la juda-kristana tradicio, tial la romanoj konfuzis ĝin kun simila greka vorto χρηστός /*ĥrēstós*/, «bona, justa, utila», kiu estis pli konvena kiel nomo propra. Tial ekz-e Tacito en siaj «Analoj» nomas kristanojn adeptoj de iu «Chrestus» (/*ĥrestus*/, latinigo de Χρηστός).

<sup>113</sup> Kalvia Krispinilla (lat. *Calvia Crispinilla*) — Roma matrono kiu aranĝadis orgiojn por Nerono.

<sup>114</sup> Latine *Noricum* — Romia provinco, la teritorio de la nunaj Aŭstrio kaj Slovenio.

<sup>115</sup>, destinitan por akceptadi pluvon enfalantan dum misvetero, ĉirkaŭis anemonoj kaj lilioj. Speciale liliojn oni videble amis en tiu ĉi domo, ĉar ili estis tie multaj — kaj blankaj, kaj ruĝaj; ankaŭ multis safirbluaj iridoj, kies delikatajn petalojn kvazaŭ arĝentitumis akva polvo. Meze de malsekaj muskoj, inter kiuj estis kaŝitaj florpotoj kun lilioj, kaj meze de folioj vidiĝis bronzaĵaj statuetoj, prezentantaj infanojn kaj akvajn birdojn. En unu angulo damaino, ankaŭ gisita el bronzo, klinis sian kapon, verdrustan pro malsekeco, al la akvo, kvazaŭ volante trinki. La planko de la atrio estis mozaika; la muroj, parte inkrustitaj per ruĝa marmoro, parte pentronamitaj per arboj, fiŝoj, birdoj kaj grifoj logis la okulojn per riĉeco de la koloroj. La pordokadroj al flankaj ĉambroj estis ornamitaj per testuda ŝelo aŭ eĉ eburo; ĉe la muroj inter la pordoj staris statuoj de la antaŭuloj de Aŭlo. Ĉie oni vidis trankvilan bonstaton, malinklinan al lukso, sed noblan kaj memrespektan.

Petronio, kiu loĝis senkompare pli riĉe kaj elegante, povis tamen trovi tie eĉ ne unu objekton, kiu ofendus lian guston — kaj li ĝuste sin turnis kun tiu rimarko al Vinicio, kiam subite sklavo velariisto<sup>116</sup> flankentiris la kurtenon apartigantan la atrion de la tabelejo<sup>117</sup>, kaj en la fundo de

<sup>115</sup> Latine *impluvium*.

<sup>116</sup> Latine *velarius*, sklavo kiu zorgas pri kurtenoj kaj velarioj.

<sup>117</sup> Latine *tablinum*, *tabulinum* — la kabineto kaj akceptejo de la dommas-

la domo montriĝis rapidpaŝe alvenanta Aŭlo Plaŭcio.

Li estis homo, proksimiĝanta al la vesperaj tagoj de la vivo, kun kapo kovrita de blanka prujno, sed vigla, kun vizaĝo energia, iom tro mallonga, sed ankaŭ iom simila al kapo de aglo. Tiufoje bildis sin sur ĝi ioma miro kaj eĉ maltrankvilo kaŭze de la neatendita alveno de la amiko, kunulo kaj konfidato de Nerono.

Sed Petronio estis tro lerta mondumano kaj tro penetrema homo por tion ne rimarki, do post la unuaj salutoj li deklaris kun la tuta elokventeco kaj flueco, kiun li sciis montri, ke li venas danki por la zorgado, kiun en tiu domo ricevis la filo de lia fratino, kaj ke sole dankemo estas la kaŭzo de lia vizito, al kiu cetere kuraĝigis lin la malnova konateco kun Aŭlo.

Aŭlo siaflanke certigis lin, ke li estas bonvena gasto, kaj koncerne dankemon, li diris, ke li mem sentas sin lia ŝuldanto, kvankam Petronio certe ne divenas la kaŭzon.

Efektive Petronio tute ĝin ne divenis. Vane levinte supren siajn noksokolorajn okulojn, li streĉis la menson por rememori plej etan servon, faritan al Aŭlo aŭ al iu alia. Li rememoris nenion, krom eble tiu, kiun li intencis fari al Vinicio. Pretervole povis verdire okazi io simila, sed nur pretervole.



— Mi amas kaj tre ŝatas Vespazianon<sup>118</sup>, — respondis Aŭlo — al kiu ci savis la vivon, kiam foje trafis lin la malfeliĉo endormiĝi dum aŭskultado de versaĵoj de Nerono.

— Trafis lin feliĉo, — diris Petronio, — ĉar li ne aŭdis ilin, sed mi ne neas, ke ĝi povis finiĝi malfeliĉe. La Kuprobarba nepre volis sendi al li centuriestron kun amika komisio, ke li malfermu al si la vejnojn.

— Kaj ci, Petronio, priridis lin.

— Jes, aŭ kontraŭe: mi diris al li, ke se Orfeo sciis dormigi per kanto sovaĝajn bestojn, lia triumfo estas egala, ĉar li sukcesis endormigi Vespazianon. Ahenobarbon oni povas mallaŭdi, sed kondiĉe, ke malgranda mallaŭdo entenu grandegan flaton. Nia moŝta aŭgustino, Popea, komprenas tion tre bone.

— Bedaŭrinde, tia estas nia tempo, — respondis Aŭlo. — Mankas al mi du antaŭaj dentoj, kiujn forrompis al mi ŝtono, ĵetita per mano de brito, kaj tamen la plej feliĉajn tagojn de mia vivo mi pasigis en Britujo...

— Feliĉajn, ĉar venkajn, — alĵetis Vinicio.

Sed Petronio, ektiminte, ke la maljuna komandanto komencos paroli pri siaj iamaj militoj, ŝanĝis la temon de la konversacio. Jen en la ĉirkaŭaĵoj de Prenesto kamparanoj trovis mortintan lupidon kun du kapoj, kaj dum la an-

<sup>118</sup> **Vespaziano** [PIV] lat. *T. Flavius Vespasianus* — Romia imperiestro (69–79 p.K.).

taŭhieraŭa ŝtormo tondro derompis angulaĵon de la templo de Luno — kio, konsiderante la malfruan aŭtunon, estis senekzempla okazo. Unu homo, iu Kotta, kiu tion al li rakontis, aldonis ankaŭ, ke la pastroj de tiu templo antaŭdiras pro tio falon de la Urbo, aŭ almenaŭ de grandega domo, kiun eviti oni povus nur per eksterordinaraj oferoj.

Aŭlo, aŭskultinte la rakonton, esprimis la opinion, ke tiajn signojn oni tamen ne devas bagateliĝi. Ke la dioj povas esti koleraĵoj pro la superplena nombro da krimoj, en tio estas nenio stranga — kaj ĉi-okaze propetaĵoj estas sendube farindaj.

Al tio Petronio diris:

— Cia domo, Plaŭcio, ne estas grandega, kvankam loĝas en ĝi eminenta homo; la mia estas verdire tro vasta por sia senvalora posedanto, tamen ankaŭ ĝi estas negranda. Sed se temas pri ruino de domo tiel granda ekzemple, kiel *Domus transitoria*<sup>119</sup>, ĉu valoras oferedoni por kontraŭagi tiun ruinon?

Plaŭcio ne respondis tiun demandon, kaj lia singardemo iomete eĉ ofendis Petronion, ĉar, malgraŭ la tuta manko de sento pri la diferenco inter bono kaj malbono, li

<sup>119</sup> *Domus transitoria* (lat.) — «Transir[e]ja domo», nomo de palaco de Nerono, situanta inter la piedoj de la montetoj Palatino kaj Eskvilino, kvazaŭ pasejo inter ili (forbrulinta en la incendio de Romo kaj poste rekonstruita kiel la «Ora domo», *Domus aurea* [337]).

neniam estis denuncanto, kaj oni povis paroli kun li tute sendanĝere. Li sekve denove ŝanĝis la temon kaj komencis laŭdi la loĝejon de Plaŭcio kaj la bonan guston, regantan en la domo.

— Ĝi estas malnova hejmo, — diris Aŭlo, — en kiu mi ŝanĝis nenion, de kiam mi ĝin heredis.

Post la flankentiro de la kurteno dividanta la atrion disde la tablejo la domo estis trae malfermita, tiel ke tra la tablejo, tra la sekvanta peristilo kaj la post ĝi situanta halo, nomata *ekuso*<sup>120</sup>, la rigardo atingis la ĝardenon, kiu vidiĝis de malproksime, kiel hela bildo en malhela kadro. Gajaj infanaj ridoj venadis de tie ĝis la atrio.

— Ha, komandanto, — diris Petronio, — lasu nin aŭskulti de proksime tiun sinceran ridon, kiu hodiaŭ estas tiel malofta.

— Volonte, — diris Plaŭcio, leviĝante. — Tio estas mia malgranda Aŭlo kaj Ligia, ludantaj pilkojn. Sed koncerne ridon, al mi ŝajnas, Petronio, ke ĝi okupas cian tutan vivon.

— La vivo indas ridon, do mi ridas, — respondis Petronio, — sed ĉi tie la rido sonas alie.

— Petronio, — aldonis Vinicio, — ridas cetere ne dum tutaj tagoj, sed pli ĝuste dum tutaj noktoj.

<sup>120</sup> Latine *œcus* — salono aŭ halo rigardanta ĝardenon.

Tiel interparolante, ili trairis laŭlonge la domon kaj troviĝis en la ĝardeno, kie Ligia kaj la malgranda Aŭlo ludis pilkojn, kiujn sklavoj, nomataj *sferistoj*<sup>121</sup>, destinitaj speciale por tiu ludo, kolektadis de la tero kaj transdonadis en iliajn manojn. Petronio ĵetis mallongan, paseman rigardon al Ligia. La malgranda Aŭlo, ekvidinte Vinicion, alkuris por lin saluti, kaj tiu lasta, pasante, klinis la kapon antaŭ la belega knabino, kiu staris kun pilko en la mano, kun haroj parte disligitaj, iom anhela kaj ruĝiĝinta.

Sed en la ĝardeno triklinio, ombrite de hedero, vinberbranĉoj kaj Ionicero, sidis Pomponia Grecina, do ili iris ŝin saluti. Petronio, kvankam li ne vizitadis la domon de Plaŭcio, konis ŝin, ĉar li vidadis ŝin ĉe Antistia, filino de Rubelio Plaŭto, kaj ankaŭ ĉe Seneko kaj Pollio. Li ne povis forpeli de si certan miron, kiun inspiris al li ŝia vizaĝo malgaja, sed serena, la nobleco de ŝia sinteno, gestoj kaj vortoj. Pomponia tiagrade konfuzis liajn ideojn pri la virinoj, ke tiu ĝisfunde malvirtema homo, memfida, kiel ne niu alia en Romo, ne nur sentis al ŝi certan specon de estimo, sed eĉ parte perdadis sian memfidon.

Tiel ankaŭ nun, dankante ŝin por la flegado de Vinicio, li intermetadis, kvazaŭ pretervole, la vorton: *domina*<sup>122</sup>, kiu neniam venis en lian penson, kiam li parolis, ek-

<sup>121</sup> Latine *spheristæ*.

<sup>122</sup> Sinjorino, mastrino (lat.).

zemple, kun Kalvia Krispinilla, kun Skribonia, kun Valeria, Solino kaj aliaj mondumaninoj. Salutinte ŝin kaj espriminte la dankojn, li tuj komencis plendi, ke oni vidas Pomponian tiel malofte, ke oni povas ŝin renkonti nek en la cirko, nek en la amfiteatro, al kio ŝi respondis trankvile, metinte la manon sur la manon de la edzo:

— Ni ambaŭ maljuniĝas kaj ŝatas ĉiam pli la hejman trankvilecon.

Petronio volis nei, sed Aŭlo Plaŭcio aldonis per sia fajfa voĉo:

— Kaj ni sentas nin ĉiam pli fremdaj inter la homoj, kiuj eĉ niajn romajn diojn nomas per grekaj nomoj.

— La dioj de certa tempo iĝis nur retorikaj figuroj, — respondis Petronio, — kaj ĉar retorikon instruis al ni grekoj, tial al mi mem pli facilas diri ekzemple «Hero» ol «Junono».

Dirinte tion, li turnis la okulojn al Pomponia, kvazaŭ por esprimi, ke en ŝia ĉeesto li povis ekpensi pri neniu alia diino, kaj poste li komencis nei tion, kion ŝi diris pri la maljuneco:

— La homoj envere rapide maljuniĝas, sed tio rilatas al tiuj, kiuj vivas tute alian vivmanieron; kaj krome ekzistas vizaĝoj, pri kiuj Saturno ŝajnas forgesi.

Petronio diris tion eĉ kun certa sincereco, ĉar Pompo-

nia Grecina, kvankam pasinta jam la tagmezon de la vivo, konservis neordinaran freŝecon de la haŭto, kaj ĉar ŝi havis malgrandan kapon kaj etan vizaĝon, ŝi faradis fojfoje, malgraŭ la malhela vesto, malgraŭ la seriozeco kaj malgajeco, la impreson de tute juna virino.

Dume la malgranda Aŭlo, kiu dum la restado de Viniĉio en la domo tre amikiĝis kun li, komencis, proksimiĝinte, inviti lin al pilkludo. Post la knabo en la triklinion eniris Ligia. Sub la kurteno de hederroj, kun lumetoj, tremantaj sur ŝia vizaĝo, ŝi ekŝajnis nun al Petronio pli bela ol ĉe la unua rigardo, kaj efektive simila al nimfo. Kaj ĉar li ĝis nun ne alparolis ŝin, tial, leviĝinte, li klinis antaŭ ŝi la kapon, kaj anstataŭ la ordinaraj salutesprimoj, komencis citi la vortojn, per kiuj Odiseo salutis Naŭzikaon:

— *Ĉu diino ci estas, aŭ fraŭlin' mortema?*  
*Sed se ci apartenas al la teranaro,*  
*Benitaj estas patro kaj patrino ciaj,*  
*Benitaj ciaj fratoj ... ..*<sup>123</sup>

Eĉ al Pomponia plaĉis la bonmaniera edukiteco de tiu mondumano. Koncerne Ligian, ŝi aŭskultis konfuzite, kun flamantaj vangoj, ne kuraĝante levi la okulojn. Sed iom post iom en la anguletoj de ŝia buŝo komencis tremi petola rideto, sur la vizaĝo vidiĝis batalo inter la knabina timi-

<sup>123</sup> «Odiseado», kanto 6<sup>a</sup> (la komenco de parolo de Odiseo al Naŭzikao).

do kaj la deziro respondi — kaj evidente la deziro venkis, ĉar, rigardinte subite Petronion, ŝi respondis al li per la vortoj de tiu sama Naŭzikao, citante ilin unuspire kaj iom kiel parkeran lecionon:

— *Ne iu ajn ci estas — kaj havas ci saĝon!*

Poste, turniĝinte surloke, ŝi forfuĝis, kiel timigita birdo.

Nun por Petronio venis la vico miri — ĉar li ne esperis ekaŭdi la verson de Homero el la buŝo de la knabino, pri kies barbara deveno lin informis Vinicio. Li do ĵetis demandan rigardon al Pomponia, sed tiu ne povis al li respondi, ĉar ŝi rigardis tiumomente, ridetante, la fierecon, kiu bildiĝis sur la vizaĝo de la maljuna Aŭlo.

Kaj Aŭlo ne povis kaŝi tiun fierecon. Unue, li amis Ligian kiel propran infanon; kaj due, malgraŭ siaj malnovromaj antaŭjuĝoj, kiuj igis lin ĵeti tondrojn kontraŭ la greka lingvo kaj ĝia disvastiĝo, li opiniis ĝin la plejsupro de la monduma bonedukiteco. Li mem neniam povis ĝin bone ellerni, kion li kaŝe bedaŭris, do nun li estis kontenta, ke al tiu eleganta sinjoro kaj verkisto, kiu eble emus konsideri lian domon barbara, oni respondis tie en la lingvo de Homero kaj per Homera verso.

— Ni havas hejme pedagogon, grekon, — li diris, turnante sin al Petronio, — kiu instruas nian filon, kaj la kna-

bino ĉeestas la lecionojn. Ŝi estas ankoraŭ birdido, sed aminda birdido, al kiu ni ambaŭ al kutimiĝis.

Petronio rigardis nun tra la plektaĵoj de hedero kaj lonicerio la ĝardenon kaj la ludantan triopon. Vinicio formetis la togon, kaj en nura tuniko suprenĵetadis pilkon, kiun Ligia, staranta kontraŭe kun levitaj brakoj, penis kapti. Je la unua rigardo la knabino ne faris je Petronio grandan impreson. Ŝi ŝajnis al li tro maldika. Sed de la momento, kiam li rigardis ŝin pli proksime en la triklinio, li pensis, ke tamen tiel povus aspekti Aŭroro — kaj, kiel spertulo, li ekkomprenis, ke estas en ŝi io eksterordinara. Ĉion li rimarkis kaj ĉion li taksis: la vizaĝon rozkoloran kaj klaran, kaj la freŝan buŝon, kvazaŭ pretan al kiso, kaj la okulojn, bluajn kiel mara lazuro, kaj la alabastran blankecon de la frunto, kaj la abundon de la malhelaj haroj, rebrilantaj sur bukloj per la koloro de sukceso aŭ de korinta kupro — kaj la sveltan kolon, kaj la «dian» deklivecon de la ŝultroj, kaj la tutan figuron flekseman, gracian, junan per la juneco de majo kaj de ĵus-ekflorintaj floroj. Vekiĝis en li artisto kaj adoranto de belo — li eksentis, ke sub statuo de tiu knabino oni povus subskribi: «Printempo».

Subite li rememoris pri Ĥrizotemiso, kaj eksentis fortan emon al rido. Ŝi ekŝajnis al li, kune kun sia ora pudro sur la haroj kaj nigritaj brovoj, senfine velkinta — io si-



mila al flaviĝinta rozo, perdanta la petalojn. Kaj tamen tiun Ĥrizotemison enviis al li la tuta Romo. Poste li rememoris Popean — kaj ankaŭ tiu famega Popea ekŝajnis al li vaksa, senanima masko. En tiu knabino kun tanagraj formoj<sup>124</sup> estis ne nur printempo — estis ankaŭ la radia «Psiĥo»<sup>125</sup>, trabilanta ŝian rozkoloran korpon, kiel lumradio trabilas el lampo.

«Inicio pravas», li ekpensis, «kaj mia Ĥrizotemiso estas maljuna, maljuna ... kiel Trojo.»

Poste li sin turnis al Pomponia Grecina — kaj, montrinte la ĝardenon, diris:

— Nun mi komprenas, *domina*, ke havante ilin du, vi preferas la hejmon ol festenojn sur Palatino kaj cirkon.

— Jes, — ŝi respondis, turnante la okulojn al la malgranda Aŭlo kaj Ligia.

Kaj la maljuna komandanto komencis rakonti la historion de la knabino kaj tion, kion li aŭdis antaŭ jaroj de Atelio Histro pri la nacio de ligioj, vivanta en la ombroj de la nordo.

La gejunuloj dume ĉesis ludi pilkon kaj dum certa

<sup>124</sup> T.e. similaj al la formoj de la terakotaj statuetoj, kiaj estis farataj en la iama Grekua urbo Tanagro (Τάναγρα). Pliparton da tanagraj statuetoj oni trovis dum prifosado en 1874, kaj ili restis scienca kaj arta aktualaĵo en la tempo kiam la romano aperis (1894–1896).

<sup>125</sup> «**Psiĥo**. (mit.) Tre bela princino (personigo de la animo), amata de Eroso» [NPiV] (gr. Ψυχή).

tempo promenis sur la ĝardeno sablo, sin bildante sur la nigra fono de mirtoj kaj cipresoj, kiel tri blankaj statuoj. Ligia tenis la manon de la malgranda Aŭlo.

Promeninte iom, ili sidiĝis sur benko apud *piscina*<sup>126</sup>, okupanta la mezon de la ĝardeno. Sed post momento Aŭlo eksaltis por peli fiŝojn en la travidebla akvo, kaj Vinicio daŭrigis la interparolon, komencitan dum la promeno.

— Jes, — li diris per malalta, vibranta voĉo. — Apenaŭ mi formetis la knaban togon<sup>127</sup>, oni sendis min en la aziajn legiojn. Mi ne ĝuis la Urbon — ekkonis nek la vivon, nek amon. Mi scias parkere iom da Anakreonto kaj Horaco, sed mi ne scius, kiel Petronio, diri versojn tiam, kiam la saĝo mutiĝas pro admiro kaj siajn proprajn vortojn ne trovas. Estante knabo, mi frekventis la lernejon de Muzonio, kiu diradis al ni, ke la feliĉo konsistas en tio, ke ni volu tion, kion volas la dioj — kaj sekve ĝi dependas de nia volo. Mi tamen pensas, ke ekzistas feliĉo alia, kiu ne dependas de la volo, ĉar ĝin nur amo povas doni. — Dioj mem serĉas tiun feliĉon, do ankaŭ mi, ho Ligia, mi, kiu ĝis nun ne ekkonis amon, serĉas, kiel ili, tiun, kiu volus doni al mi la feliĉon...

Li eksilentis — kaj dum certa tempo oni aŭdis nur fa-

<sup>126</sup> *piscina* (lat.) — fiŝlageto.

<sup>127</sup> Latine *toga praetexta* — blanka purpure borderita togo, kian i.a. portis infanoj ekde 14 ĝis 17 jaroj.

cilan plaŭdadon de la akvo, en kiun la malgranda Aŭlo ĵetadis ŝtonetojn, pelante per ili fiŝojn. Sed post momento Vinicio ree ekparolis, per voĉo ankoraŭ pli mola kaj pli mallaŭta:

— Ci ja konas la filon de Vespaziano, Titon<sup>128</sup>? Oni diras, ke, apenaŭ kreskinte super la knaban aĝon, li tiel ekamis Berenikon, ke la sopiro preskaŭ elsuĉis el li la vivon ... Ankaŭ mi sciis tiel ekami, ho Ligia! Riĉeco, gloro, potenco — vanta fumo! Malgravaĵo! Homo riĉa trovos alian, pli riĉan, homon gloran eklipsos alia pli glora, potenculon superos pli potenca ... Sed ĉu la imperiestro mem, ĉu iu el la dioj povas senti volupton pli grandan kaj esti pli feliĉa ol simpla mortemulo, kiam ĉe lia brusto spiregas brusto kara, kiam li kisas la amatan buŝon ... Do amo faras nin egalaj al dioj — ho Ligia!

Kaj ŝi aŭskultis en maltrankvilo, en miro, kaj samtempe tiel, kvazaŭ ŝi aŭskultus sonon de greka fluto aŭ citro. Ŝajnis al ŝi momente, ke Vinicio kantas ian strangan kanton, kiu sin verŝas en ŝiajn orelojn, ekscitas ŝian sangon, kaj kune estigas en la koro svenecon, timon kaj ian nekomprenblan ĝojon ... Ŝajnis al ŝi ankaŭ, ke li diras ion tian, kio jam estis en ŝi antaŭe, sed kion ŝi ne sciis al si konsciigi. Ŝi sentis, ke li vekas en ŝi ion, kio dormis ĝis

<sup>128</sup> «**Tito**. Vira nomo, i.a. de Romia imperiestro, filo de Vespaziano (reginta 79–81)» [NPiV] (lat. *Titus*)

nun, kaj ke en tiu momento la nebula sonĝo sin ŝanĝas en formon ĉiam pli klaran, pli plaĉan kaj pli belan.

Dume la suno jam estis delonge ruliĝinta trans Tiberon kaj staris malalte super la Janikula monto. Sur la senmovajn cipresojn falis ruĝa lumo — kaj la tuta aero estis de ĝi traigita. Ligia levis al Vinicio siajn bluajn okulojn, kvazaŭ vekitajn el dormo, kaj subite en la vesperaj rebriloj li, klinita super ŝi kun peto, tremanta en la okuloj, ekŝajnis al ŝi pli bela ol ĉiuj homoj kaj ĉiuj grekaj kaj romaj dioj, kies statuojn ŝi vidadis sur la frontonoj de temploj. Kaj li ĉirkaŭfingris facile ŝian manon super la artikoj kaj demandis:

— Ĉu ci divenas, Ligia, kial mi diras al ci ĉi tion?

— Ne! — ŝi reflustris tiel mallaŭte, ke Vinicio apenaŭ ekaŭdis.

Sed li ne ekkredis al ŝi, kaj altirante ĉiam pli forte ŝian manon, li alpemis ĝin al la koro, batanta, kiel martelo pro la pasio, ekscitita de la belega knabino, kaj li turnus rekte al ŝi brulajn vortojn, se sur la vojeto, ĉirkaŭita de mirtaj kadroj, ne montriĝus la maljuna Aŭlo, kiu diris, alproksimiĝinte:

— La suno subiras; gardu cin kontraŭ la vespera malvarmo kaj ne ŝercu je Libitino...<sup>129</sup>

<sup>129</sup> **Libitino** — diino de morto kaj entombigo.

— Ne, — respondis Vinicio, — mi ne surmetis ĝis nun la togon, kaj ne sentas malvarmon.

— Kaj jam apenaŭ duono de la sundisko vidiĝas el trans la montoj, — diris la maljuna militisto. — Glorata estu la dolĉa klimato de Sicilio, kie vespere popolo kunvenas sur placoj por per ĥorkantoj adiaŭi la subirantan Febron.

Kaj forgesinte, ke antaŭ momento li mem avertis kontraŭ Libitino, li komencis rakonti pri Sicilio, kie li havis posedaĵojn kaj grandan terkulturan bienon, la objekton de sia amo. Li menciis ankaŭ, ke jam kelkfoje venis al li la ideo translokiĝi en Sicilion kaj tie trankvile pasigi la reston de la vivo. La vintraj prujnoj estas jam sufiĉaj al tiu, kies kapon la vintroj blankigis. Ne falas ankoraŭ folioj de arboj kaj super la urbo la ĉielo favore ridetas, sed kiam flaviĝos vino, kiam neĝo surŝutos la Albanajn montojn kaj la dioj sendos tremigan venton en Kampanion, tiam — kiu scias? — eble li translokiĝos kun la tuta domo en sian trankvilan kamparan restadejon.

— Ĉu ci deziras forlasi Romon, Plaŭcio? — demandis Vinicio kun subita maltrankvilo.

— Jam delonge mi tion deziras, — respondis Aŭlo, — ĉar tie estas pli trankvile kaj pli sendanĝere.

Kaj denove li komencis glori siajn fruktoĝardenojn,

brutarojn, domon, kaŝitan en verdaĵoj, kaj montetojn, kovritajn de timiano kaj kampaj floroj, inter kiuj zumas aroj da abeloj. Sed Vinicio ne atentis tiun idilian tonon — kaj, pensante nur pri tio, ke li povas perdi Ligian, li rigardis al Petronio, kvazaŭ de li sola li esperus savon.

Dume Petronio, sidante apud Pomponia, ĝuis la vidaĵon, kiun prezentis la subiranta suno, la ĝardeno kaj la homoj, starantaj ĉe la lageto. Iliaj blankaj vestoj sur la malhela fono de la mirtoj brilis orkolore en la vesperaj lumoj. Sur la ĉielo la vesperruĝo komencis koloriĝi purpure kaj viole kaj nuanci, kiel opalo. La firmamento iĝis violeta. La nigraj siluetoj de la cipresoj farigis ankoraŭ pli klaraj ol dum la taga lumo, kaj en la homoj, en la arboj, kaj en la tuta ĝardeno ekregis vespera trankvilo.

Petronio frapis tiu trankvilo, kaj precipe frapis lin la trankvilo en la homoj. En la vizaĝoj de Pomponia, de la maljuna Aŭlo, de ilia filo kaj de Ligia estis io, kion li ne vidadis en tiuj vizaĝoj, kiuj lin ĉirkaŭis ĉiutage, aŭ pli ĝuste ĉiunokte; estis en ili ia lumo, ia animpaco kaj ia serenco, fluanta el tiu vivo, kiun ĉiuj vivis ĉi tie. Kaj kun certa miro li pensis, ke povis tamen ekzisti belo kaj dolĉeco, kiun li, eterne postkuranta belon kaj dolĉecon, neniam konis. Kaj li ne sciis kaŝi en si tiun senton, sed turninte sin al Pomponia, diris:

— Mi konsideras en mi, kiel diferencas via mondo de tiu mondo, kiun regas nia Nerono.

Kaj ŝi levis sian malgrandan vizaĝon al la vespera ĉielruĝo kaj respondis kun simpleco:

— La mondon regas ne Nerono, sed Dio.

Sekvis momento da silento. Proksime de la triklinio aŭdiĝis paŝoj de la maljuna komandanto, de Vinicio, Ligia kaj la malgranda Aŭlo — sed antaŭ ol ili alvenis, Petronio demandis ankoraŭ:

— Do ci kredas je la dioj, Pomponia?

— Mi kredas je Dio, kiu estas unu, justa kaj ĉiopova, — respondis la edzino de Aŭlo Plaŭcio.

## Ĉapitro 3<sup>a</sup>

— Ŝi kredas je dio, kiu estas unu, ĉiopova kaj justa, — ripetis Petronio en la momento, kiam li denove troviĝis en la portilo sole kun Vinicio. — Se ŝia dio estas ĉiopova, tiam li regas la vivon kaj morton; kaj se li estas justa, li juste sendas la morton. Kial do Pomponia funebras Julian? Bedaŭrante Julian, ŝi riproĉas al sia dio. Mi devas ripeti tiun rezonadon al nia kuprobarba simio, ĉar mi trovas, ke en la dialektiko mi egalas Sokraton. Koncerne la virinojn, mi konsentas, ke ĉiu el ili havas du aŭ tri animojn, sed neniu havas prudentan animon. Pomponia medi-

tu kun Seneko aŭ kun Kornuto<sup>130</sup> pri tio, kio estas ilia granda *Logoso*<sup>131</sup>... Kune ili elaperigadu la ombrojn de Ksenofano, Parmenido, Zenono kaj Platono, kiuj enuas ie en Kimerujo<sup>132</sup>, kiel fringeloj en kaĝo... Mi volis paroli kun ŝi kaj Plaŭcio pri io alia. Je la sankta ventro de la egipta Izido! Se mi dirus al ili tute simple, por kio ni venis, mi supozas, ke ilia virto eksonorus, kiel kupra ŝildo, frapita per bastono. Kaj mi ne kuraĝis! KREDU al mi, VINICIO, mi ne kuraĝis! Pavoĵ estas tre belaj birdoj, sed krias tro laŭte. Mi tamen devas aprobi cian elekton. Vera «rozfingra Aŭroro»! Kaj ĉu ci scias, kion krome ŝi pensigis al mi? — Printempon! — ne la nian, en Italujo, kie ape-naŭ kelkloke pomarbo kovras sin per floroj, kaj olivarboj grizas, kiel ili grizis — sed tian printempon, kian mi vidis iam en Greklando, junan, freŝan, hele-verdan ... Je tiu blanka Seleno — mi ne miras cin, Marko, sciu tamen, ke ci amas Dianon, kaj ke Aŭlo kaj Pomponia estus pretaj cin disŝiri, kiel iam la hundoj disŝiris Akteonon.

Vinicio, ne levante la kapon, silentis dum momento,

<sup>130</sup> Lucius Annæus **Cornutus** — roma filozofo (stoikisto) de la 1<sup>a</sup> jc.

<sup>131</sup> **Logoso**, gr. λόγος — en la greka filozofio: la plej baza, esenca strukturo de la estado, la kosma racio; en kristanismo: la Vorto (*Johano* 1:1), kiu estas Jesuo Kristo.

<sup>132</sup> Latine *Cimmeria*, greke Κιμμέρια — la mita «lando de kimeroj» (Κιμμέριοι), kien ne penetras sunradioj kaj kie situas la enirejo en Hadeson («Odiseado», 11:13–19); laŭ alia mito, iam la kimeroj deklaris, ke ili ne bezonas la diojn; indignigite de la blasfemo, Hadeso englutis Kimerujon.



kaj poste komencis paroli per voĉo interrompata de pasio:

— Mi avidis ŝin antaŭe, sed nun mi avidas ŝin pli multe. Kiam mi ĉirkaŭprenis ŝian manon, fajro min ekblovis ... Mi devas ŝin havi. Se mi estus Zeŭso, mi ĉirkaŭprenus ŝin per nuboj, kiel li ĉirkaŭprenis Ioon<sup>133</sup>, mi falus sur ŝin per pluvgutetoj, kiel li falis sur Danainon. Mi volus kisi ŝian buŝon ĝis doloro! Mi volus aŭdi ŝian krion en miaj brakoj. Mi volus mortigi Aŭlon kaj Pomponian, kaj ŝin forkapti kaj porti en la brakoj en mian domon. Mi ne dormos hodiaŭ. Mi ordonos skurĝi iun sklavon kaj aŭskultos liajn ĝemojn.

— Trankviliĝu, — diris Petronio, — cialoj deziroj indas ĉarpentiston el Suburo.

— Estas al mi egale. Mi devas ŝin havi. Mi petis cin pri konsilo, sed se ci ĝin ne trovas, mi mem ĝin trovos ... Aŭlo konsideras Ligian kiel filinon, kial do mi rigardu ŝin kiel sklavon? Do, se ne ekzistas alia rimedo, ŝi ĉirkaŭŝpinu la pardonon de mia domo, ŝmiru ĝin per lupa grasaĵo, kaj eksidu, kiel mia edzino, ĉe mia hejmfajro.

— Trankviliĝu, malsaĝa posteulo de konsuloj. Ne tial ni venigas barbarojn ŝnurligitaj post niaj ĉaroj, por poste al ni edzinigi iliajn filinojn. Gardu cin kontraŭ la ekstremo. Elĉerpu simplajn, honestajn rimedojn, kaj lasu al ci

<sup>133</sup> **Ioo**, gr. Ἴώ (ankaŭ **Iono** [QE], **Io** [NPIV], **Io** [PIV]) estis reĝidino el la greka urbo Argo, amatino de Zeŭso kaj praulino de Heraklo.

mem kaj al mi iom da tempo por pensi pri tio. Ankaŭ al mi Ĥrizotemiso ŝajnis filino de Jovo, tamen mi ne edziĝis al ŝi — same kiel Nerono ne edziĝis al Akteo<sup>134</sup>, kvankam oni ŝin faris filino de reĝo Atalo<sup>135</sup>. Trankviliĝu ... Pensu, ke se ŝi volos forlasi la domon de Aŭlo pro ci, li ne rajtos ŝin reteni, kaj ankaŭ tion sciuj, ke ne ci sola brulas, ĉar ankaŭ en ŝi Eroso flamigis fajron ... Mi vidis ĉi tion, kaj al mi oni devas kredi ... Paciencu. Por ĉio ekzistas rimedo, sed mi jam tro multe pensis hodiaŭ, kaj tio min lacigas. Mi tamen promesas al ci, ke jam morgaŭ mi pensos pri cia amo, kaj Petronio ne estus Petronio, se li ne trovus ian rimedon.

Ili ambaŭ eksilentis — fine post certa tempo Vinicio diris jam pli trankvile:

- Dankon al ci, kaj malavare favoru cin Fortuno.
- Paciencu.
- Kien ci ordonis cin porti?
- Al Ĥrizotemiso ...
- Feliĉa ci estas, posedante tiun, kiun ci amas.
- Mi? Ĉu ci scias, kio min ankoraŭ amuzas en Ĥrizotemiso? Jen tio, ke ŝi perfidas min kun mia propra liberig-

<sup>134</sup> **Akteo** (gr. Ακτί) — liberigitino kaj amdonantino de Nerono.

<sup>135</sup> Greke Ἄτταλος — nomo de pluraj reĝoj Pergamiaj. Anakronismo: la lasta reĝo Pergamia, Atalo la 3<sup>a</sup>, testamentis sian reĝujon al Romio kaj mortis en la jaro 133<sup>a</sup> a.K.

ito, la liutisto Teoklo, kaj pensas, ke mi tion ne vidas. Iam mi amis ŝin, kaj nun amuzas min ŝiaj mensogoj kaj malsaĝeco. Venu al ŝi kun mi. Se ŝi komencos cin koketi kaj deŝegni sur la tablo literojn per fingro, trempita en vino, sciu, ke mi ne estas ĵaluza.

Kaj ili ordonis porti sin ambaŭ al Ĥrizotemiso. Sed en la vestiblo Petronio metis la manon sur la ŝultron de Vinicio.

— Atendu, ŝajnas, ke mi elpensis rimedon.

— Ĉiuj dioj cin rekompencu.

— Jes! Ŝajnas, ke la rimedo estas senerara. Ĉu ci scias,

Marko?

— Mi aŭskultas cin, mia Ateno...

— Post kelkaj tagoj la dia Ligia manĝos en cia domo la grajnon de Demetro.

— Ci estas pli granda ol la imperiestro! — ekkriis ekscite Vinicio.

## Ĉapitro 4<sup>a</sup>

Petronio efektive plenumis la promeson.

La tagon post la vizito ĉe Ĥrizotemiso li verdire tutan tradormis, sed vespere li ordonis porti sin sur Palatinon kaj havis kun Nerono konfidencan interparolon, sekve de kiu, la trian tagon, antaŭ la domo de Plaŭcio aperis centuriestro kun dekelkaj pretoriaj soldatoj<sup>136</sup>.

La tempo estis necerta kaj terura. Tiaspecaj senditoj estis plej ofte anoncantoj de morto. Tial en la momento, kiam la centuriestro ekfrapis per la frapilo la pordon de Aŭlo, kaj kiam la atriestro sciigis, ke en la vestiblo trovas sin soldatoj, teruro ekregis en la tuta domo. La familio tuj grupiĝis ĉirkaŭ la maljuna komandanto, ĉar neniu dubis, ke la danĝero ekpezis antaŭ ĉio super li. Pomponia, ĉirkaŭbrakinte lian kolon, alpremis sin al li per ĉiuj fortoj, kaj ŝiaj sensangiĝintaj lipoj movis sin rapide, elparolante iajn mallaŭtajn vortojn; Ligia kun vizaĝo blanka, kiel tolo, kisis lian manon; la malgranda Aŭlo kroĉis sin al lia togo — el koridoroj, el ĉambroj, kuŝantaj sur la etaĝo kaj destinitaj por servistinoj, el servistejo, el banejo, el subaj enkelaj loĝejoj, el la tuta domo komencis elkuri aroj da

---

<sup>136</sup> pretoria soldato, pretoriano — ano de **pretorio** (lat. *prætorium*), la imperiestra gvardio.

sklavoj kaj sklavinoj. Aŭdiĝis ekkrioj: «*Heu! Heu, me miserum!*»<sup>137</sup> — virinoj ekploregis; kelkaj el ili eĉ komencis grati siajn vangojn, aŭ kovri la kapojn per tukoj.

Sole la maljuna komandanto mem, kiu kutimis de multaj jaroj rigardi la morton rekte en la okulojn, restis trankvila, kaj nur lia mallonga, agla vizaĝo iĝis kvazaŭ skulptita el ŝtono.

Post momento, trankviliginte la plorkriojn kaj ordoninte al la servistoj disiri, li diris:

— Lasu min, Pomponia. Se venis mia fino, ni havos tempon por adiaŭi unu la alian.

Li forŝovis ŝin facile — kaj ŝi diris:

— Estu cia sorto ankaŭ mia, ho Aŭlo!

Poste, ĵetinte sin sur la genuojn, ŝi komencis preĝi kun tia forto, kian povas doni nur timo pri amata persono.

Aŭlo transiris en la atrion, kie lin atendis la centuriestro. Tio estis maljuna Gajo Hasta, lia iama subulo kaj kamarado en la britaj militoj.

— Honoron al ci, komandanto, — li diris. — Mi alportas al ci ordonon kaj saluton de la imperiestro — kaj jen estas la tabuletoj, la signo, ke mi venas en lia nomo.

— Mi dankas la imperiestron por la saluto, kaj la ordo-

<sup>137</sup> *heu, me miserum!* (lat.) — ve, mi malfeliĉa!

non mi plenumos, — respondis Aŭlo. — Estu bonvena, Hasta, kaj diru, kun kia komisio ci venas.

— Aŭlo Plaŭcio, — komencis Hasta, — la imperiestro eksciis, ke en cia domo trovas sin la filino de la reĝo de la ligioj, kiun la dirita reĝo, ankoraŭ dum la vivo de la dia Klaŭdio, transdonis en la romianajn manojn kiel garanti-on, ke la limoj de la imperio estos neniam tuŝitaj de la ligioj. La dia Nerono estas danka al ci, komandanto, ke dum tiom da jaroj ci estis ŝia gastiganto, sed, ne volante ŝargi plue cian domon, kaj ankaŭ konsiderante, ke la fraŭlino, kiel garantiulino, devas esti zorgata de la imperiestro mem kaj de la senato — li ordonas al ci transdoni ŝin en miajn manojn.

Aŭlo estis tro malnova soldato kaj tro hardita viro por, ricevinte ordonon, permesi al si bedaŭron, vanajn vortojn aŭ plendojn. Malgraŭ tio sulko de subita kolero kaj doloro aperis sur lia frunto. Antaŭ tia sulkiĝo de lia frunto tremis iam la britaj legioj, kaj eĉ en ĉi tiu momento sur la vizaĝo de Hasta speguliĝis timo. Sed nun, ricevinte la ordonon, Aŭlo Plaŭcio eksentis sin sendefenda. Dum certa tempo li rigardis la tabuletojn, la signon; poste, levinte la okulojn al la maljuna centuriestro, li diris jam trankvile:

— Atendu en la atrio, Hasta, ĝis la garantiulino estos

al ci transdonita.

Kaj post tiuj vortoj li transiris en la alian finon de la domo, en la halon, nomatan *ekuso*, kie Pomponia Grecina, Ligia kaj la malgranda Aŭlo atendis lin kun maltrankvilo kaj timo.

— Al neniu minacas morto, nek ekzilo sur malproksimajn insulojn, — li diris, — tamen la sendito de la imperiestro estas anoncanto de malfeliĉo. La afero koncernas cin, Ligia.

— Ligian? — ekkriis kun miro Pomponia.

— Jes! — diris Aŭlo.

Kaj turninte sin al la knabino, li komencis paroli:

— Ligia, ci estis edukata en nia domo, kiel nia propra infano, kaj ni ambaŭ, mi kaj Pomponia, amas cin, kiel filinon. Sed ci scias, ke ci ne estas nia filino. Ci estas garantiulino, donita de cia nacio al Romo, kaj la zorgado pri ci apartenas al la imperiestro. Kaj nun la imperiestro forprenas cin el nia domo.

La komandanto parolis trankvile, sed per ia stranga, ne ordinara tono. Ligia aŭskultis liajn vortojn, palpebrumante, kvazaŭ ne komprenante pri kio temas, la vangojn de Pomponia kovris paleco; en la pordo, kondukanta el la koridoro al la *ekuso*, denove komencis montri sin la teruritaĵoj de sklavinaj.

— La volo de la imperiestro estu plenumita, — diris Aŭlo.

— Aŭlo! — ekkriis Pomponia, ĉirkaŭbrakante la knabino, kvazaŭ ŝi volus ŝin defendi, — pli bone estus por ŝi morti.

Kaj Ligia, premante sin al ŝia brusto, ripetadis: «Ho patrino! Patrino!» ne povante, meze de plorĝemoj, eligi aliajn vortojn. Sur la vizaĝo de Aŭlo denove bildiĝis kolerokaj doloro.

— Se mi estus sola en la mondo, — li diris malserene, — mi ne fordonus ŝin viva, — kaj miaj parencoj povus ankoraŭ hodiaŭ oferedoni por ni *Jovi liberatori...*<sup>138</sup> Sed mi ne rajtas pereigi cin kaj nian infanon, kiu povas ĝisvivi pli feliĉajn tempojn ... Ankoraŭ hodiaŭ mi iros al la imperiestro kaj petegos, ke li ŝanĝu la ordonon. Ĉu li min elaŭskultos — mi ne scias. Dume adiaŭ, Ligia — kaj sciu, ke tiel mi, kiel Pomponia ĉiam benis la tagon, en kiu ci eksideis ĉe nia hejma fajro.

Dirinte tion, li metis la manon sur ŝian kapon, sed kvankam li penis konservi trankvilecon, tamen en la momento, kiam Ligia turnis al li siajn okulojn, plenajn je larmoj, kaj poste, kaptinte lian manon, komencis premi ĝin al la buŝo, en lia voĉo ekvibris doloro profunda, patra.

<sup>138</sup> *Jovi Liberatori* (lat.) — al Jovo (Jupitero) liberiganto.



— Adiaŭ, nia ĝojo kaj lumo de niaj okuloj! — li diris.

Kaj rapide li reiris en la atrion por ne lasi sin ekregi de kortuŝo, neinda je romano kaj komandanto.

Dume Pomponia, kondukinte Ligian en ŝian ĉambron, komencis ŝin trankviligi, konsoli, kuraĝigi kaj paroli vortojn, kiuj strange sonis en ĉi tiu domo, kie, en la apuda ĉambro, staris ankoraŭ la lararo<sup>139</sup> kaj fajrujo, sur kiu Aŭlo, fidela al la malnova moro, faradis oferojn al la hejmaj dioj. Venis la tempo de provo. Iam Virginio trapikis la bruston de sia filino por ŝin liberigi el la manoj de Appio; pli frue ankoraŭ Lukrecia memvole pripagis la malhonoron per la vivo. La imperiestra palaco estas kaverna de malvirto, malbono, krimo. — «Sed ni, Ligia, scias, kial ni ne rajtas levi la manon kontraŭ nin mem!» Jes! Tiu leĝo, sub kiu ili ambaŭ vivas, estas alia, pli granda, pli sankta, ĝi tamen permesas defendi sin kontraŭ malbono kaj malhonoro, eĉ se tiun defendon oni devus pripagi per la vivo kaj torturoj. Se iu eliras pura el malsanktejo de malvirto, tiom pli granda estas lia merito. La tero estas tia malsanktejo, sed feliĉe la vivo estas unu mallonga momento, kaj oni nur leviĝas el tombo, trans kiu regas ne plu Nerono, sed Kompato — kaj anstataŭ doloro estas ĝojo, kaj anstataŭ larmoj estas feliĉo.

<sup>139</sup> Latine *lararium*, kolekto da laroj (statuetoj de hejmaj dioj), kaj la loko (lararejo) por ili.

Poste ŝi komencis paroli pri si mem. Jes! Ŝi estas trankvila — sed ankaŭ en ŝia brusto ne mankas doloraj vundoj. Ĉar sur la okuloj de ŝia Aŭlo kuŝas ankoraŭ vualo, ne surfluis lin ankoraŭ la torento de la lumo. Ankaŭ ne estas al ŝi permesite instrui la Veron al la filo. — Do kiam ŝi ekpensas, ke tiel povas daŭri ĝis la fino de la vivo, kaj ke povas veni momento de disiĝo kun ili, disiĝo centoble pli granda kaj pli terura ol ĉi tiu tempa, kiun ili ambaŭ nun priploras — ŝi eĉ ne povas imagi, kiamaniere ŝi povos esti feliĉa sen ili, eĉ en la ĉielo. Kaj multajn noktojn ŝi jam ploris, multajn tagojn ŝi preĝis, petegante kompaton kaj favoron. Sed sian doloron ŝi oferas al Dio — kaj atendas — kaj fidas. Kaj kiam nun nova bato ŝin frapas, kiam la ordono de la tirano forprenas de ŝi la karan estaĵon, kiun Aŭlo nomis lumo de iliaj okuloj, ŝi ankoraŭ fidas, kredante, ke ekzistas Potenco pli granda ol tiu de Nerono — kaj Kompato pli forta ol lia kruelo.

Kaj ankoraŭ pli forte ŝi alpremis al la brusto la kapeton de la knabino; tiu malsupreniĝis al ŝiaj genuoj, kaj kaŝante la okulojn en la faldoj de ŝia peplo<sup>140</sup>, restis tiel longan tempon en silento, sed, kiam ŝi fine leviĝis, sur ŝia vizaĝo vidiĝis jam iom da trankvilo.

— Mi sopiros cin, patrino, kaj la patron, kaj la fraton,

<sup>140</sup> **peplo** [PIV] (lat. *peplum*) — senmanika virina mantelo, kiun oni agrafis sur la ŝultro.

mi scias tamen, ke kontraŭstaro nenion helpus, nur vin ĉiujn pereigus. Sed mi promesas al ci, ke mi neniam forgesos ciajn vortojn en la palaco de la imperiestro.

Ankoraŭfoje ŝi ĵetis la brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon, kaj poste, kiam ili ambaŭ eniris en la *ekuson*, ŝi komencis adiaŭi la malgrandan Plaŭcion, maljunan grekon, kiu estis ilia instruisto, sian vestistinon, kiu iam ŝin vartis, kaj ĉiujn sklavojn.

Unu el ili, alta kaj larĝaŝultra ligio, kiun oni hejme nomis Urso, kaj kiu iam, kune kun la patrino de Ligia kaj ŝi mem, venis inter iliaj aliaj servantoj en la romian tendaron, falis nun al ŝiaj piedoj, kaj poste kliniĝis al la genuoj de Pomponia, dirante:

— Ho *domina!* permesu al mi sekvi mian sinjorinon, ke mi ŝin servu kaj gardu en la palaco de la imperiestro!

— Ci ne estas nia servisto, sed de Ligia, — respondis Pomponia, — sed ĉu oni cin allasos al la pordo de la palaco? Kaj kiamaniere ci povos ŝin gardi?

— Mi ne scias, *domina*, nur tion mi scias, ke fero rompiĝas en miaj manoj, kiel ligno...

Aŭlo Plaŭcio, kiu venis en tiu momento, eksciinte pri la afero, ne nur ne kontraŭstaris la deziron de Urso, sed diris, ke ili eĉ ne rajtas lin reteni. Ili forsendas Ligian, kiel garantiulinon, kiun la imperiestro postulas — estas sekve

ilia devo forsendi ŝian servistaron, kiu kune kun ŝi transiras en lian zorgadon. Ĉe tio li flustris al Pomponia, ke, pretekstante la servistaron, ŝi povas doni al Ligia tiom da sklavinuoj, kiom ŝi trovas konvene, ĉar la centuriestro ne povas ilin malakcepti.

Por Ligia estis en tio certa konsolo, kaj ankaŭ Pomponia estis kontenta, ke ŝi povas ŝin ĉirkaŭigi per servistoj laŭ sia elekto. Kaj tiel krom Urso ŝi destinis al ŝi la maljunan vestistinon, du kipraninojn, lertajn en kombado, kaj du ĝermanajn banistinojn. La elekto, kiun ŝi faris, trafis ekskluzive konfesantojn de la nova instruo; konsiderante, ke ankaŭ Urso konfesis ĝin jam de kelkaj jaroj, Pomponia povis fidi la fidelecon de tiu servistaro, kaj samtempe ĝoji pro la penso, ke la semoj de la vero estos ĵetitaj en la imperiestran palacon.

Ŝi ankaŭ skribis kelkajn vortojn, rekomendante Ligian al la zorgado de Akteo, liberigitino de Nerono. Pomponia verdire ne vidis ŝin en la kunvenoj de la konfesantoj de la nova instruo, sed ŝi aŭdis de ili, ke Akteo neniam rifuzas al ili servojn, kaj ke ŝi avide legas leterojn de Paŭlo el Tarso. Ŝi sciis cetere, ke la juna liberigitino vivas en ĉiama malĝojo, ke ŝi estas persono malsimila al ĉiuj domaninoj de Nerono, kaj ke ĝenerale ŝi estas la bona spirito de la palaco.

Hasta promesis mem transdoni la leteron al Akteo. Konsiderante kiel naturan aferon, ke reĝa filino devas havi sian sekvantaron, li neniel kontraŭis kunpreni ĝin en la palacon, mirante, male, la malgrandan nombron de la servistoj. Li petis tamen, ke ili rapidu, timante, ke oni kulpigos lin pri manko de diligenteco en plenumado de ordonoj. La horo de la disiĝo alvenis. La okulojn de Pomponia kaj Ligia denove plenigis larmoj, Aŭlo ankoraŭfoje metis la manon sur ŝian kapon, kaj post momento la soldatoj, akompanataj per krioj de la malgranda Aŭlo, kiu, defende al la fratino, minacis per siaj malgrandaj pugnoj al la centuriestro — forkondukis Ligian al la imperiestra palaco.

Sed la maljuna komandanto ordonis pretigi por si portilon, kaj dume, sin ferminte kun Pomponia en pinakoteko najbara al la *ekuso*, diris al ŝi:

— Aŭskultu min, Pomponia. Mi iras al la imperiestro, kvankam mi pensas ke vane; kaj malgraŭ tio, ke la vorto de Seneko nenion plu signifas ĉe li, mi estos ankaŭ ĉe Seneko. Hodiaŭ pli multe signifas Sofonio, Tigeleno, Petronio aŭ Vatinio. Koncerne la imperiestron, li eble eĉ neniam aŭdis pri la nacio de la ligioj, kaj se li postulis transdonon de Ligia, ĝi okazis tial, ke iu lin al tio instigis, kaj facile estas diveni, kiu povis ĝin fari.

Kaj ŝi levis subite al li la okulojn.

— Petronio?

— Jes.

Sekvis momento da silento, post kio la komandanto daŭrigis:

— Jen kion signifas lasi trans sian sojlon iun el tiuj homoj sen honoro kaj konscienco. Malbenita estu la momento, en kiu Vinicio eniris nian domon! Li, Vinicio, venigis al ni Petronion. Ve al Ligia, ĉar ne garantiulinon, sed konkubinon ili volas!

Kaj lia parolo, sekve de kolero, de senhelpa furiozo kaj ĉagreno pro la krominfano, iĝis ankoraŭ pli fajra ol ordinare. Dum certa tempo li luktis kontraŭ si mem, kaj nur la kunpremitaj pugnoj atestis, kiel malfacila estis tiu interna batalo.

— Ĝis nun mi gloris la diojn, — li diris, — sed en ĉi tiu momento mi pensas, ke ili ne ekzistas super la mondo, kaj ke ekzistas nur unu, kruelega, furioza kaj monstra, kiu nomas sin Nerono.

— Aŭlo! — diris Pomponia. — Nerono estas nur manpleno da putra polvo antaŭ Dio.

Li dume komencis marŝi per grandaj paŝoj sur la mozaiko de la pinakoteko. En lia vivo estis grandaj faroj, sed ne estis grandaj malfeliĉoj, do li ne estis al ili kutimiĝinta.

La maljuna soldato amis Ligian pli multe ol li mem sciis pri tio, kaj nun li ne povis paciĝi kun la penso, ke li ŝin perdis. Krom tio li sentis sin humiligita. Ekpezegis sur li tiu mano, kiun li malestimis, kaj samtempe li sentis, ke antaŭ tiu forto lia forto estas nenio.

Sed kiam li fine kvietigis en si la koleron, kiu malklarigis liajn pensojn, li diris:

— Mi supozas, ke Petronio ne forigis ŝin de ni por Nerono, ĉar li ne volus inciti kontraŭ si Popean. Sekve aŭ por si mem, aŭ por Vinicio ... Ankoraŭ hodiaŭ mi ekscios ĉi tion.

Kaj post momento la portilo lin portis al Palatino. Pomponia, restinte sola, iris al la malgranda Aŭlo, kiu ne ĉesis priplori la fratinton kaj minaci la imperiestron.

## Ĉapitro 5<sup>a</sup>

Aŭlo tamen prave supozis, ke li ne estos allasita antaŭ la vizaĝon de Nerono. Oni respondis al li, ke la imperiestro estas okupita pri kantado kun la liutisto Terpno, kaj ke ĝenerale li ne akceptas tiujn, kiujn li mem ne vokis. Tio signifis, ke Aŭlo ne provu, ankaŭ estonte, vidi la imperiestron.

Aliflanke Seneko, kvankam malsana je febro, akceptis la maljunan komandanton kun respekto ŝuldata al li — sed kiam li elaŭskultis lian aferon, li ridetis maldolĉe kaj diris:

— Nur unu servon mi povas fari al ci, nobla Plaŭcio, tio estas: neniam montri al Nerono, ke mia koro sentas cian doloron, kaj ke mi volus cin helpi; ĉar se Nerono ekhavis tiurilate plej etan suspekton, sciu, ke li ne redonus al ci Ligian, kvankam li havus kontraŭ tio neniam aliajn motivojn ol agi spite al mi.

Li ankaŭ ne konsilis al li turni sin al Tigeleno, nek al Vatinio, nek al Vitelio. Per mono oni eble povus ion efiki ĉe ili; eble ili volus ankaŭ spiti al Petronio, kies influon ili penas ekŝanceli; sed plej verŝajne ili perfidus al Nerono, kiagrade Ligia estas kara al Plaŭcio, kaj tiam Nerono tiom pli certe ŝin ne redonus. Ĉe tio la maljuna saĝulo komenc-



is paroli kun morda ironio, kiun li turnis kontraŭ si mem:

— Ci silentis, Plaŭcio, ci silentis dum tutaj jaroj, kaj Nerono ne amas tiujn, kiuj silentas. Kiel ci povis ne raviĝadi pri lia beleco, virto, kantado, pri lia deklamado, veturigado kaj versaĵoj. Kiel ci povis ne glori la morton de Britaniko, ne diri laŭdparoladon je la honoro de patrinmortiginto kaj ne esprimi gratulojn pro la sufoko de Oktavia? Mankas al ci antaŭvidemo, Aŭlo, la antaŭvidemo, kiun ni, vivantaj feliĉe ĉe la kortego, posedas en konvena grado.

Tiel parolante, li prenis vazeton, kiun li portis ĉe la zono, ĉerpis akvon el la fontano de la pluvujo, refreŝigis la bruligitan buŝon kaj parolis plu:

— Ha, Nerono havas dankeman koron. Li amas cin, ĉar ci servis al Romo kaj disportis la gloron de lia nomo al la ekstretoj de la mondo, kaj li amas min, ĉar en lia juneco mi estis lia majstro. Tial, vidu, mi scias, ke ĉi tiu akvo ne estas venenita, kaj mi trinkas ĝin trankvile. Vino en mia domo estus malpli sendanĝera, sed se ci soifas, trinku ĉi tiun akvon. La akvotuboj kondukas ĝin el la Albana montaro, kaj por ĝin veneni, oni devus veneni ĉiujn fontanojn en Romo. Kiel ci vidas, oni povas ankoraŭ esti sekura en tiu ĉi mondo kaj havi trankvilan maljunecon. Mi estas, vere, malsana, sed malsanas pli ĝuste mia animo ol la korpo.

Tio estis vero. Al Seneko mankis tiu anima forto, kiun posedis, ekzemple, Kornuto aŭ Trazeo, do lia vivo estis sinsekvo da kompromisoj, farataj kun krimo. Li mem tion sentis, li mem komprenis, ke adepto de la principoj de Zenono el Cintio devus iri alian vojon, kaj li suferis pro tio pli multe ol pro la timo de morto mem.

Sed la komandanto interrompis nun liajn maldolĉajn konsiderojn.

— Nobla Aneo, — li diris, — mi scias, kiel la imperiestro rekompencis al ci la zorgemon, kiun ci montris al li en lia juneco. Sed la forkapton de nia infano kaŭzis Petronio. Montru al mi rimedojn kontraŭ li, montru influojn, kiuj je li efikas, kaj fine mem uzu por li la tutan elokventecon, kiun sukcesos al ci inspiri la malnova amikeco al mi.

— Petronio kaj mi, — respondis Seneko, — estas homoj el du kontraŭaj tendaroj. Rimedojn kontraŭ li mi ne konas, efikas je li nenies influo. Povas esti, ke malgraŭ sia tuta malvirtemo li pli valoras ankoraŭ ol tiuj kanajloj, per kiuj Nerono hodiaŭ sin ĉirkaŭigas. Sed peni lin konvinki, ke li plenumis malbonan faron, estas nur perdi la tempon; Petronio delonge perdis tiun senton, kiu distingas malbonon de bono. Konvinku lin, ke lia faro estas malbela — tiam li ekhontos. Kiam mi vidos lin, mi diros al li: cia ago indas liberigiton. Se tio ne helpos, nenio helpos.

— Dankon eĉ pro tio, — respondis la komandanto.

Poste li ordonis porti sin al Vinicio, kiun li trovis skermanta kun doma skermisto. Kiam Aŭlo ekvidis la junan viron trankvile ekzercanta sin en momento, en kiu la atenco kontraŭ Ligia estis plenumita, ekregis lin terura kolero, kiu, apenaŭ la kurteno falis post la skermisto, eksplodis per torento da maldolĉaj riproĉoj kaj insultoj. Sed Vinicio, eksciinte, ke Ligia estas forkaptita, paliĝis tiel terure, ke eĉ dum momento Aŭlo ne povis lin suspekti pri partopreno en la atenco.

La frunto de la junulo kovriĝis per ŝvito; la sango, kiu por momento forkuris en la koron, refluis varmonde en la vizaĝon, la okuloj ŝprucigis fajrerojn, el la buŝo elfluis senordaj demandoj. Ĵaluzo kaj furiozo skuis lin alterne, kiel uragano. Ŝajnis al li, ke Ligia, foje transirinte la sojlon de la imperiestra palaco, estas por li perdita por ĉiam, kaj kiam Aŭlo eldiris la nomon de Petronio, suspekto, kvazaŭ fulmo, trakuris la menson de la juna soldato — ke Petronio ekmokis lin, aŭ donacante Ligian al Nerono, volis per tio certigi al si novajn favorojn de la imperiestro, aŭ ke li volis reteni ŝin por si mem. Ke iu, ekvidinte Ligian, ne ekdeziru ŝin samtempe — tion li ne kapablis imagi.

Nesinregemo, simila al ekfuriozinta ĉevalo, kaj hereda en lia familio, ekposedis lin nun kaj senigis je la konscio.

— Komandanto — li diris per interrompata voĉo, — reiru hejmen kaj atendu min ... Sciu, ke se Petronio estus eĉ mia patro, mi venĝus al li la malbonon faritan al Ligia. Revenu hejmen kaj atendu min. Nek Petronio, nek Nerono ŝin havos!

Post tio li turnis la kunpremitajn pugnojn al la vaksaj maskoj, kiuj staris en ŝrankoj en la atrio, kaj eksplodis:

— Je tiuj mortmaskoj! Antaŭe mi mortigos ŝin kaj min mem!

Dirinte tion, Vinicio saltleviĝis, kaj ankoraŭfoje ĵetinte al Aŭlo la vortojn: «Atendu min!», li elkuris, kiel freneza, el la atrio kaj impetis al Petronio, dispuŝante envoje preterpasantojn.

Aŭlo revenis hejmen kun ioma espero. Li supozis, ke se Petronio instigis Neronon forkapti Ligian por ŝin fordoni al Vinicio, Vinicio rekondukos ŝin en ilian domon. Fine nemalgrave konsolis lin la penso, ke se Ligia ne estos savita, ŝi estos tamen venĝita kaj ŝirmita per morto kontraŭ la malhonoro. Li kredis, ke Vinicio plenumos ĉion, kion li promesis. Li vidis lian furiozon kaj konis la ekscitemon, denaskan en lia tuta gento. Li mem, kvankam li amis Ligian, kiel patro, preferus ŝin mortigi ol fordoni al Nerono, kaj se li ne konsiderus la filon, la lastan posteulon de sia gento, li sendube tion farus. Aŭlo estis soldato,

pri la stoikistoj li apenaŭ aŭdis, sed per la karaktero li ne multe diferencis de ili, kaj al liaj ideoj, al lia fiereco morto konvenis pli facile kaj pli bone ol malhonoro.

Reveninte hejmen, li trankviligis Pomponian, transdonis al ŝi sian esperon, kaj ili ambaŭ komencis atendi novaĵojn de Vinicio. De tempo al tempo, kiam en la atrio aŭdiĝadis paŝoj, ili kredis, ke tio estas Vinicio, rekondukanta al ili la amatan infanon, kaj ili estis pretaj el la tuta animo beni ilin ambaŭ. Sed la tempo pasadis, kaj neniu novaĵo venis. Nur vespere aŭdiĝis la frapilo ĉe la pordo.

Post momento sklavo eniris kaj transdonis al Aŭlo leteron. La maljuna komandanto, kvankam li ŝatis elmontradi sinregemon, prenis ĝin tamen per iom tremanta mano kaj komencis legi tiel avide, kvazaŭ de tiu letero dependus la ekzisto de lia tuta domo.

Subite lia vizaĝo mallumiĝis, kvazaŭ falus sur ĝin ombro de pasanta nuboj.

— Legu, — li diris, turninte sin al Pomponia.

Pomponia prenis la leteron kaj legis kio sekvas:

*«Marko Vinicio, saluton al Aŭlo Plaŭcio.*

*Kio okazis, okazis laŭ la volo de la imperiestro, antaŭ kiu vi klinu la kapojn, kiel klinas mi kaj Petronio.»*

Sekvis longa silento.

## Ĉapitro 6<sup>a</sup>

Petronio estis hejme. La pordisto ne kuraĝis haltigi Vinicion, kiu enkuris la atrion, kiel fulmotondro, poste, eksciinte, ke la mastron endas serĉi en la biblioteko, same impete enkuris la bibliotekon, kaj trovinte Petronion skribanta, elŝiris la kanon el lia mano, rompis ĝin, ĵetegis teren, poste premkaptis liajn brakojn per la fingroj kaj, proksimigante sian vizaĝon al la lia, komencis raŭkvoĉe demandi:

— Kion ci faris pri ŝi? Kie ŝi estas?

Sed subite okazis io mirindega. La delikatforma kaj malhardita Petronio kaptis la manon de la juna atleto, premantan lian brakon, post tio li kaptis lian duan manon, kaj tenante ilin ambaŭ en sia unu kun forto de fera premilo, li diris:

— Mi estas malfortulo nur matene, sed vespere mi reakiras la antaŭan viklecon. Provu liberiĝi. Gimnastikon evidente instruis al ci teksisto, kaj konduton forĝisto.

Sur lia vizaĝo eĉ ne vidiĝis kolero, nur en la okuloj ekflametis ia pala rebrilo de kuraĝo kaj energio. Post momento li lasis la manojn de Vinicio, kiu staris antaŭ li humiligita, hontigita kaj furioza.

— Ŝtalan manon ci havas, — li diris, — sed je ĉiuj dioj

de la infero mi ĵuras, ke se ci min perfidis, mi enbatos ponnardon en cian gorgon, eĉ en la ĉambroj de la imperiestro.

— Ni parolu trankvile, — diris Petronio. — Ŝtalo estas pli forta ol fero, do kvankam el unu cia brako oni povus fari du miajn, mi ne devas cin timi. Aliflanke, doloras min cia krudeco, kaj se la homa maldankemo povus min ankoraŭ mirigi, mi mirus cian maldankemon.

— Kie estas Ligia?

— En la malĉastejo, tio estas en la imperiestra palaco.

— Petronio!

— Trankviliĝu kaj sidiĝu. Mi petis Neronon pri du aferoj, kiujn li promesis al mi: unue, ke li eligu Ligian el la domo de Aŭlo, due, ke li donu ŝin al ci. Ĉu ci ne havas ponnardon ie en la faldoj de cia togo? Eble ci frapos min? Sed mi konsilas al ci atendi kelkajn tagojn, ĉar oni prenis cin en malliberejon, kaj dume Ligia enuus en cia domo.

Sekvis silento. Vinicio dum certa tempo rigardis Petronion per mirplenaj okuloj, post kio li diris:

— Pardonu min. Mi ŝin amas, kaj la amo konfuzas mian prudenton.

— Admiru min, Marko. Antaŭhieraŭ mi diris al Neron la jenon: «Mia nevo, Vinicio, tiel ekamegis iun malgrasaĉan knabinon, kiun oni prizorgas ĉe Aŭlo Plaŭcio, ke lia

domo ŝanĝis sin en vaporbanejon de sopiroj. Ci, Ceza-ro, — mi diris, — kaj mi, kiuj scias, kio estas la vera bel-eco, ne donus por ŝi eĉ mil sestercojn, sed la knabo ĉiam ja estis malsaĝa, kiel tripeda tablo, kaj nun li entute mal-saĝiĝis».

— Petronio!

— Se ci ne komprenas, ke mi diris tion, volante seku-rigi Ligian, mi emas ekkredi, ke mi diris la veron. Mi per-svadis al la Kuprobarba, ke tia estetikulo, kiel li, ne povas konsideri tian knabinon bela, kaj Nerono, kiu ĝis nun ne kuraĝas rigardi alie ol per miaj okuloj, ne trovos en ŝi bel-econ, kaj ne trovinte ĝin, li ŝin ne deziros. Oni devis sen-danĝerigi la simion kaj bridu ĝin per ŝnuro. Nun Ligian pritaksos ĝuste ne li, sed Popea, kaj nature ŝi klopodos ki-el eble baldaŭ forigi ŝin el la palaco. Kaj mi diris, kvazaŭ senintence al la Kupra barbo: «Prenu Ligian kaj donu ŝin al Vinicio. Ci rajtas tion fari, ĉar ŝi estas garantiulino, kaj se ci tion faros, ci malbonagos kontraŭ Aŭlo.» Kaj li kon-sentis. Li havis nenian kaŭzon por malkonsenti, tiom pli, ke mi donis al li okazon suferigi honestajn homojn. Oni faros cin oficiala gardisto de la garantiulino, oni transdo-nos en ciajn manojn tiun ligian trezoron, kaj ci, kiel alian-cano de la bravaj ligioj, kaj kune fidela servisto de la im-periestro, ne nur nenion perdos el tiu trezoro, sed eĉ klo-



podos ĝin multoblige. La imperiestro, dezirante konservi la formojn, tenos ŝin dum kelkaj tagoj en sia domo, kaj poste forsendos ŝin en cian domon, feliĉulo!

— Ĉu tio estas vero? Nenio minacas ŝin en la imperiestra palaco?

— Se ŝi devus ekloĝi tie por ĉiam, Popea parolus pri ŝi kun Lokusta<sup>141</sup>, sed dum kelkaj tagoj nenio ŝin minacas. En la imperiestra palaco estas dek mil homoj. Povas esti, ke Nerono ŝin tute ne vidos, tiom pli, ke li tiagrade ĉion konfidis al mi, ke antaŭ momento estis ĉe mi la centurionstro kaj sciigis, ke li forkondukis la knabinon en la palacon kaj transdonis en la manojn de Akteo. Akteo estas bonkora persono, kaj tial mi ordonis transdoni Ligian al ŝi. Pomponia Grecina videble same opinias, ĉar ŝi skribis al Akteo. Morgaŭ estos festeno ĉe Nerono. Mi rezervis por ci lokon apud Ligia.

— Pardonu mian kolerecon, Gajo, — diris Vinicio. — Mi pensis, ke ci ordonis forkapti ŝin por ci mem, aŭ por Nerono.

— Mi povas pardoni cian kolerecon, sed pli malfacilas al mi pardoni ciajn vulgaraĵojn, krudajn kriojn kaj la voĉon, similan al tiu de morao-ludanto. Tio ne plaĉas al mi, Marko, kaj de tio gardu cin. Sciu, ke la peristo de

<sup>141</sup> *Locusta* aŭ *Lucusta* (lat.) — fama roma venenistino (m. 69).

Verono estas Tigeleno, kaj sciŭ ankaŭ, ke se mi volus preni la knabinon por mi mem, tiam, rigardante rekte en ĉiajn okulojn, mi dirus al ĉi la jenon: Vinicio, mi forprenas de ĉi Ligian, kaj mi tenos ŝin tiel longe, ĝis ŝi enuigos min.

Tiel parolante, li komencis rigardi per siaj noksokoloraj pupiloj rekte en la okulojn de Vinicio, kun esprimo malvarma kaj impertinenta, kaj la juna viro entute konfuziĝis.

— La kulpo estas mia, — li diris. — Ĉi estas bona, honesta, kaj mi dankas ĉin el la tuta animo. Permesu nur fari al ĉi ankoraŭ unu demandon. Kial ĉi ne ordonis sendi Ligian rekte en mian domon?

— Ĉar la imperiestro volas konservi la formojn. Oni parolos pri tio en Romo, kaj ĉar ni forprenis Ligian kiel garantiulinon, tial, tiel longe kiel oni parolos, ŝi restos en la imperiestra palaco. Poste oni senbrue forsendos ŝin al ĉi, kaj la afero estos finita. La Kuprobarba estas malkuraĝa hundo. Li scias, ke lia potenco estas senlima, tamen li penas trovi pretekston por ĉiu sia ago. Ĉu ĉi jam kvietiĝis tiom, por povi iomete filozofi? Ofte venis en mian penson la demando: Kial krimo — eĉ se ĝi estas potenco, kiel imperiestro, kaj kiel li, certa pri senpuneco — ĉiam klopodas pri ŝajnoj de leĝo, de justeco kaj virto? Por kio tiu peno?

Mi opinias, ke mortigi sian fraton, patrinon kaj edzinon estas faroj, indaj je iu azia reĝaĉo, ne je romia imperiestro; sed se tio al mi okazus, mi ne skribus pravigajn leterojn al la senato ... Sed Nerono skribas — Nerono serĉas pretekstojn, ĉar Nerono estas timulo. Tamen Tiberio, ekzemple, ne estis timulo — malgraŭ tio li pravigadis ĉiujn siajn farojn. Kial estas tiel? Kio estas tiu stranga, pretervola respekto, kiun malbono esprimas al virto? Ĉu ci scias, kio ŝajnas al mi? Laŭ mi, ĝi okazas tial, ĉar krimo estas malbela, kaj virto estas bela. *Sekve*, vera estetikulo estas samfakte virtulo. *Sekve*, mi estas virtulo. Mi devas hodiaŭ verŝi iom da vino al la ombroj de Protagoro, Prodiko kaj Gorgio<sup>142</sup>. Montriĝas, ke ankaŭ la sofistoj povas fojfoje esti utilaj. Aŭskultu min, ĉar mi parolas plu. Mi forprenis Ligian de Aŭlo por ŝin doni al ci. Bone. Sed Lizipo farus el vi belegajn grupojn. Vi ambaŭ estas belaj, sekve ankaŭ mia faro estas bela, kaj estante bela, ĝi ne povas esti malbona. Rigardu, Marko! jen antaŭ ci sidas virto, enkorpigita en Petronion. Se Aristido vivus, li devus veni al mi kaj oferi al mi cent minojn<sup>143</sup> por mallonga prelego pri virto.

<sup>142</sup> **Protagoro** [PIV] (Πρωταγόρας), **Prodiko** (Πρόδικος) kaj **Gorgio** [PIV] (Γοργίας) — malnovgrekaj filozofoj de la 5<sup>a</sup> jc a.K., fondintoj de la sofista skolo.

<sup>143</sup> **minao** (gr. μνᾶ, lat. *mina*) — antikva mezurunuo de pezo (ĉ. funto), poste monunuo. En la sumera-babilonia 60-uma sistemo, 1 talanto = 60 minaoj. En Londona Biblio *min'o*, en la PIV-oj *mino*.

Sed Vinicio, homo kiun la realeco interesis pli ol prelegoj pri virto, diris:

— Morgaŭ mi vidos Ligian, kaj poste mi havos ŝin en mia domo ĉiutage, ĉiam kaj ĝis la morto.

— Ci havos Ligian, sed mi havos sur la kapo Aŭlon. Li alvokos kontraŭ mi venĝon de ĉiuj subteraj dioj. Kaj se li, bestaĉo, prenis antaŭe lecionon de deklamado... Sed li insultos tiel, kiel miajn klientojn insultadis mia iama pordisto, kiun cetere mi pro tio sendis en kamparan punlaborojon.

— Aŭlo estis ĉe mi. Mi promesis sendi al li sciigon pri Ligia.

— Skribu al li, ke la volo de la «dia» imperiestro estas la plej alta leĝo, kaj ke cia unua filo ricevos la nomon Aŭlo. Havu la maljunulo ian konsolon. Mi pretas peti la Kuprobarban voki lin al la morgaŭa festeno. Li cin ekvidu en la triklinio apud Ligia.

— Ne faru tion, — diris Vinicio. — Mi tamen sentas kompaton al ili, speciale al Pomponia.

Kaj li eksidis por skribi tiun leteron, kiu senigis la maljunan komandanton je la lasta espero.

## Ĉapitro 7<sup>a</sup>

Antaŭ Akteo, la eksamatino de Nerono, iam klinadis sin la plej altaj kapoj en Romo. Sed ŝi eĉ tiam ne volis miksi sin en la publikajn aferojn, kaj se ŝi fojfoje uzis sian influon je la juna regnestro, ŝi faris tion nur por elpeti kompaton por iu. Modesta kaj humila, ŝi gajnis dankemon de multaj, kaj malamikigis kontraŭ si neniun. Eĉ Oktavia ne kapablis ŝin ekmalami. Al ĵaluzuloj ŝi ŝajnis nesufiĉe danĝera. Oni sciis, ke ŝi plu amas Nerono per amo malgaja kaj suferplena, kiu vivas jam ne per espero, sed nur per rememorado de la tempo, kiam Nerono estis ne nur pli juna kaj amanta, sed ankaŭ pli bona. Oni sciis, ke ŝi ne kapablas forŝiri la animon kaj penson disde tiuj rememoroj, sed atendas jam nenion; kaj ĉar neniu timis, ke Nerono revenos al ŝi, oni rigardis ŝin kiel estaĵon tute senarman, kaj tial oni lasis ŝin en paco. Popea konsideris ŝin nur kiel humilan servantinon, sendanĝeran ĝis tia grado, ke ŝi eĉ ne postulis ŝian forigon el la palaco.

Tamen ĉar Nerono ŝin iam amis kaj forlasis sen ofendo, en trankvila, kaj eĉ certgrade amika maniero, oni konservis por ŝi certan respekton. Nerono, liberiginte ŝin, donis al ŝi en la palaco loĝejon kun aparta dormoĉambro kaj iom da servistoj. Kaj ĉar siatempe Palaso kaj Narciso

<sup>144</sup>, kvankam liberigitoj de Klaŭdio, ne nur partoprenis en festenoj de Klaŭdio, sed eĉ, kiel potencaj ministroj, okupis distingajn lokojn, ankaŭ ŝin oni invitadis iafoje al la tablo de la imperiestro. Oni faradis tion eble tial, ke ŝia belega persono estis vera ornamo de la festeno. Cetere, koncerne la elekton de la societo, Nerono jam delonge forlasis ĉiajn konsiderojn. Ĉe lia tablo sidadis plej diversa miksamaso da homoj de ĉiaj klasoj kaj profesioj. Estis inter ili senatanoj, sed ĉefe tiaj, kiuj konsentis esti kune arlekenoj. Estis patricioj, maljunaj kaj junaj, avidaj je volupto, lukso kaj vivoĝuo. Estis virinoj, havantaj grandajn nomojn, sed ne hezitantaj vespere surmeti blondajn perukojn<sup>145</sup> kaj distrisin, serĉante aventurojn en mallumaj stratoj. Estis ankaŭ altaj oficistoj kaj pastroj, kiuj ĉe plenaj pokaloj mem volonte mokis siajn diojn, kaj apud ili — ĉiaspeca kanajlaro, konsistanta el kantistoj, mimikistoj, muzikistoj, dancistoj kaj dancistinoj; el poetoj, kiuj, deklamante versaĵojn, pensis pri la sestercoj, kiujn ili esperis akiri per laŭdado de versaĵoj de Nerono; el filozofoj-mizeruloj, sekvantaj per avidaj okuloj la servatajn manĝojn; el famaj veturigistoj, ĵonglistoj, miraklistoj, fabelrakontistoj, komikistoj; fine el

<sup>144</sup> *Ti. Klaŭdus Narcissus* (m. 54 p.K.) — ekssklavo de Klaŭdio, kiu partoprenis en konvikto de Mesalino; unu el la unuaj viktimoj de Nerono.

<sup>145</sup> Latine *flava coma* (laŭvorte «blonda hararo», pli poezie «orharulino») estis esprimo aludanta facilmoran virinon.

diversaj sentaŭguloj, kiujn modo aŭ malsaĝeco kronis kiel unutagajn eminentulojn, kaj inter kiuj ne mankis eĉ tiaj, kiuj per longaj haroj kovris la orelojn, trapikitajn signe de sklaveco.

La pli famaj el ili okupis la lokojn rekte ĉe la tabloj, la malpli gravaj servis dum la manĝado kiel distristoj, atendante la momenton, en kiu la servistaro permesos al ili ĵeti sin sur la restintajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Tiaspecajn gastojn venigadis Tigeleno, Vatinio kaj Vitelio; al la gastoj ili ofte devis havigi vestojn, konvenajn al la ĉambroj de la imperiestro, kiu cetere ŝatis tian societon, sentante sin en ĝi plej senĝena. La lukso de la kortego orumis ĉion kaj donis sian brilon al ĉio. Grandaj kaj malgrandaj, idoj de eminentaj gentoj kaj strataj ĉifonuloj, potencaj artistoj kaj mizeraj talentaĉuloj premis sin en la palacon por satigi la ravitajn okulojn per la lukso, superanta la homan imagon, kaj proksimiĝi al la disdonanto de ĉiaj favoroj, riĉaĵoj kaj bonoj, kies unu kaprico povis verdire malaltigi, sed ankaŭ povis senmezure altigi.

En tiu tago ankaŭ Ligia devis partopreni en simila festeno. Timo, necerteco kaj kapturino, ne mirindaj post la subita travivaĵo, batalis en ŝi kun la deziro malobei. Ŝi timis Neronon, ŝi timis la homojn, ŝi timis la palacon, kies svarmobruo preskaŭ senigis ŝin je la konscio, ŝi timis la

festenojn, pri kies senhonteco ŝi aŭdis de Aŭlo, de Pomponia Grecina kaj iliaj amikoj. Estante juna knabino, ŝi ne estis tamen senscia pri la vivo, ĉar la scio pri malbono frue atingadis en tiuj tempoj eĉ infanajn orelojn. Ŝi sciis do, ke en tiu palaco ŝin minacas perejo, pri kiu cetere ŝin avertis Pomponia en la adiaŭa momento. Tamen havante animon junan, nekutimigitan al malvirto, kaj fervore konfesante la instruon, enradikigitan al ŝi de la kvazaŭ-patrino, ŝi promesis defendi sin kontraŭ tiu perejo: ŝi tion promesis al la patrino, al si mem, kaj ankaŭ al tiu Dia Instruisto, je kiu ŝi ne nur kredis, sed kiun ŝi ankaŭ ekamis per sia duoninfana koro pro la dolĉeco de lia instruo, pro la maldolĉeco de la morto kaj pro la gloro de la leviĝo el mortintoj.

Ŝi estis ankaŭ certa, ke nun nek Aŭlo, nek Pomponia Grecina estos plu respondaj pri ŝiaj agoj, ŝi do pripensis, ĉu estos pli bone malobei kaj ne iri al la festeno. Unuflanke timo kaj maltrankvilo laŭte parolis en ŝia animo, aliflanke naskiĝis en ŝi la deziro montri kuraĝon, persiston, riski torturojn aŭ morton. La Dia Instruisto ja tiel ordonis. Ja li mem donis la ekzemplon. Pomponia ja rakontis al ŝi, ke la plej fervoraj inter la kredantoj avidas per la tuta animo tian provon kaj preĝas pri ĝi. Ankaŭ Ligian, kiam ŝi estis ankoraŭ infano, ekregadis fojfoje simila



deziro. Ŝi vidis sin martirino, kun vundoj en la manoj kaj piedoj, blanka, kiel neĝo, belega per supertera belegeco, portata de same blankaj anĝeloj en la ĉielbluon, kaj ŝia animo trovis ĝuon en similaj vizioj. Estis en tio multe da infanaj revoj, sed estis ankaŭ iom da memplaĉo pro kiu Pomponia ŝin admonis. Kaj nun, kiam la malobeo al la volo de la imperiestro povis sekviĝi ian teruran punon, kaj kiam la torturoj, ofte imagitaj en revoj, realiĝis, al la belaj vizioj, al la memplaĉo, aliĝis ankoraŭ ia scivolo, miksitaj kun timo — kiel oni ŝin punos kaj kian specon de torturoj oni por ŝi elektos.

Kaj tiel ŝia ankoraŭ duoninfana animo sin ŝancelis en du flankojn. Sed Akteo, eksciinte pri tiu hezitado, ekrigardis ŝin kun tia mirego, kvazaŭ la knabino parolus en deliro. Montri malobeon al la volo de la imperiestro? Riski de la unua momento lian koleron? Por tio oni ja devas esti infano, ne scianta, kion ĝi diras. El la propraj vortoj de Ligia montriĝas, ke, fakte, ŝi ne estas garantiulino, sed knabino, forgesita de sia nacio. Defendas ŝin neniu leĝo de nacioj, kaj eĉ se ĝi ŝin defendus, la imperiestro estas sufiĉe potenca por dispremi ĝin per la piedoj en momento de kolero. Ekplaĉis al la imperiestro ŝin preni, kaj de tiam li ŝin disponas. De tiam ŝi dependas de lia volo, super kiu estas neniu alia en la mondo.

— Jes, — ŝi parolis plu, — ankaŭ mi legis la leterojn de Paŭlo el Tarso, kaj mi scias, ke super la tero estas Dio kaj estas la Filo de Dio, kiu leviĝis el mortinoj, sed sur la tero estas nur la imperiestro. Memoru tion, Ligia. Mi scias ankaŭ, ke cia instruo ne permesas al ci esti tio, kio mi estis, kaj ke kiam venas elekto inter malhonoro kaj morto, al vi, kiel al la stoikistoj, pri kiuj rakontis al mi Epikteto<sup>146</sup>, permesite estas nur la morton elekti. Sed ĉu ci povas antaŭvidi, ke cin atendas morto, ne malhonoro? Ĉu ci ne aŭdis pri la filino de Sejano<sup>147</sup>, kiu, estante ankoraŭ malgranda infano, devis, laŭ la ordono de Tiberio, suferi malhonorigon antaŭ la morto, por ke respektita estu la leĝo, kiu malpermesas mortpuni virgulinon? Ligia, Ligia, ne incitu la imperiestron! Kiam venos la decida momento, kiam ci devos elekti inter malhonoro kaj morto, ci agos, kiel cia Vero al ci ordonas, sed ne serĉu propravole pereon kaj ne incitu pro malgrava kaŭzo la teran, kaj krom tio kruelan, dion.

Akteo parolis kun granda kompatato, kaj eĉ kun ekscito, kaj estante denature miopa, ŝi alŝovis sian dolĉan vizaĝon al la vizaĝo de Ligia, kvazaŭ volante kontroli, kian

<sup>146</sup> «**Epikteto**. Helena stoika filozofa, sklavo en Romo (50–ĉ. 125)» [NPiV] (gr. Ἐπίκτητος).

<sup>147</sup> *Lucius Aelius Sejanus* — favorato de Tiberio, konviktita pri konspiro kaj ekzekutita (31 p.K.). Pri la cirkonstancojn raportas Tacito (*Analoj*, V, 9).

impreson faras ŝiaj vortoj.

Kaj Ligia, kun fidemo de infano ĵetinte siajn brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon, diris:

— Ci estas bona, Akteo.

Akteo, kies koron tuŝis la laŭdo kaj fidemo, alpremis ŝin al la brusto, kaj post tio, liberiĝinte el la brakoj de la knabino, respondis:

— Mia feliĉo pasis, kaj la ĝojo pasis, sed malbona mi ne estas.

Poste ŝi komencis iri per rapidaj paŝoj en la ĉambro kaj paroli al si mem, kvazaŭ kun malespero:

— Ne! Ankaŭ li ne estis malbona. Li mem tiam pensis, ke li estas bona, kaj volis esti bona. Mi scias tion plej certe. Ĉio tio venis pli malfrue ... kiam li ĉesis ami ... Aliaj faris lin tia, kia li estas — aliaj — kaj Popea!

Tiam larmoj kovris ŝiajn okulharojn. Ligia sekvis ŝin dum kelka tempo per siaj bluaj okuloj, kaj fine ŝi diris:

— Ci lin bedaŭras, Akteo?

— Mi bedaŭras, — respondis obtuze la grekino.

Denove ŝi komencis paŝi kun manoj kunpremitaj, kvazaŭ de doloro, kaj kun senhelpa vizaĝo.

Kaj Ligia malkuraĝe demandis plu:

— Ci lin ankoraŭ amas, Akteo?

— Mi amas ...

Post momento ŝi aldonis:

— Lin neniu amas, krom mi...

Sekvis silento, dum kiu Akteo penis reatingi trankvilecon, konfuzitan de la rememoroj, kaj kiam fine ŝia vizaĝo akiris la kutiman esprimon de silenta malĝojo, ŝi diris:

— Ni parolu pri ci, Ligia. Eĉ ne pensu malobei la imperiestron. Tio estus frenezaĵo. Trankviliĝu fine. Mi bone konas tiun domon kaj mi supozas, ke flanke de la imperiestro nenio cin minacas. Se Nerono ordonus cin forkapti por si mem, oni ne venigus cin sur Palatinon. Ĉi tie regas Popea, kaj Nerono, de kiam ŝi naskis al li la filinon, estas ankoraŭ pli sub ŝia povo ... Ne, Nerono ordonis, vere, ke ci ĉeestu la festenon, sed ĝis nun li cin ne vidis, nek demandis pri ci, do pri ci li sin ne interesas. Eble li forprenis cin de Aŭlo kaj Pomponia nur pro malamo al ili. Petronio al mi skribis, ke mi zorgu pri ci, kaj ĉar, kiel ci scias, ankaŭ Pomponia skribis, tial verŝajne ili interkompreniĝis. Eble li faris tion laŭ ŝia peto. Se tiel estas, se ankaŭ li, laŭ la peto de Pomponia, zorgus pri ci, nenio cin minacas, kaj eĉ povas esti, ke Nerono laŭ lia instigo resendos cin al Aŭlo. Mi ne scias, ĉu Nerono lin tre amas, sed mi scias, ke malofte li kuraĝas malkonsenti kun lia opinio.

— Ha, Akteo! — respondis Ligia. — Petronio estis ĉe

ni, antaŭ ol oni min forprenis, kaj mia patrino estis konvinkita, ke Nerono ekpostulis la transdonon de mi laŭ lia instigo.

— Tio estus malbona, — diris Akteo.

Sed, enpenŝiginte por momento, ŝi daŭrigis:

— Eble tamen Petronio nur elbabilis antaŭ Nerono ĉe iu nokto manĝo, ke li vidis ĉe Aŭlo la garantiulinon de la ligioj, kaj Nerono, kiu estas ĵaluza pri sia aŭtoritato, ekpostulis cin tial, ke garantiuloj apartenas al la imperiestro. Li cetere ne amas Aŭlon kaj Pomponian ... Ne! Ne ŝajnas al mi, ke Petronio, se li volus forpreni cin de Aŭlo, uzus tian rimedon ... Mi ne scias, ĉu Petronio estas pli bona ol tiuj, kiuj ĉirkaŭas la imperiestron, sed li estas alia ... Cetere eble, krom Petronio, ci trovos ankoraŭ iun, kiu volus propeti pri ci. Ĉu ci ne ekkonis ĉe Aŭlo iun proksiman al Nerono?

— Mi vidadis Vespazianon kaj Titon.

— Nerono ilin ne amas.

— Kaj Senekon.

— Sufiĉas, se Seneko ion konsilas, ke la imperiestro agu kontraŭe.

La hela vizaĝo de Ligia komencis kovri sin per ruĝo.

— Kaj Vinicion.

— Mi lin ne konas.

— Li estas parenco de Petronio, kiu antaŭ nelonge revenis el Armenujo.

— Ĉu ci pensas, ke Nerono rigardas lin favore?

— Vinicion ĉiuj amas.

— Kaj li volus propeti pri ci?

— Jes.

Akteo ridetis senteme kaj diris:

— Ci certe vidos lin ĉe la festeno. Partopreni ĝin ci devas, unue tial, ke ci devas ... Nur tia infano, kiel ci, povus pensi alie. Due, se ci volas reveni la domon de Aŭlo, ci trovos okazon peti Petronion kaj Vinicion, ke ili per sia influo akiru por ci permeson de reveno. Se ili estus ĉi tie, ili ambaŭ dirus al ci la samon, kiel mi: ke freneze kaj pereige estus malobei. La imperiestro povus, vere, ne rimarki cian foreston, sed se li ĝin rimarkus kaj ekpensus, ke ci kuraĝis malrespekti lian volon, tiam ne estus por ci rimedo de savo. Venu, Ligia. Ĉu ci aŭdas tiun bruon en la domo? La suno jam malleviĝas kaj baldaŭ la gastoj komencos alveni.

— Ci pravas, Akteo, — respondis Ligia, — kaj mi sekvos cian konsilon.

Kiom da deziro renkonti Vinicion kaj Petronion estis en ŝia decido, kiom da virina scivolo vidi almenaŭ foje en la vivo tian festenon, kaj en ĝi la imperiestron, la korteg-

on, la faman Popean kaj aliajn belulinojn, kaj tiun tutan senegalan lukson, pri kiu oni rakontis mirindaĵojn en Romo, sendube Ligia mem ne povis al si konsciigi. Sed malgraŭ tio Akteo estis prava, kaj la knabino bone tion sentis. Ŝi devis iri; kiam do la nepreco kaj la simpla prudento subtenis la kaŝitan tenton, ŝi ĉesis heziti.

Akteo kondukis ŝin tiam en sian propran *unktorion* por ŝin pomadi kaj vesti, kaj kvankam en la imperiestra palaco ne mankis sklavinoj, kaj Akteo havis sufiĉe da ili por la persona priservado, tamen, pro kompatato al la knabino, kies senkulpeco kaj beleco movis ŝian koron, ŝi decidis mem vesti Ligian. Kaj tuj montriĝis, ke en la juna grekino, malgraŭ ŝia malĝojo kaj malgraŭ profunda legado de la leteroj de Paŭlo el Tarso, restis ankoraŭ multe el la greka animo, al kiu korpa beleco parolas pli ol ĉio alia en la mondo. Nudiginte Ligian kaj ekvidinte ŝian korpon, kune flekseman kaj plenan, formitan kvazaŭ el perlamoto kaj rozo, ŝi ne povis deteni krion de miro, kaj, foriĝinte je kelkaj paŝoj, rigardis kun admiro tiun senkomparan, printempan figuron.

— Ligia! — ŝi ekkriis fine, — ci estas miloble pli bela ol Popea!

Sed la knabino, edukita en la severa domo de Pomponia, kie oni gardis modestecon, eĉ kiam virinoj estis nur

inter si, staris — belega, kiel belega sonĝo, harmonia, kiel verko de Praksitelo, aŭ kiel kanto, sed konfuzita, roza de honto, kun genuoj kunpremitaj, kun manoj sur la brusto kaj kun okulharoj mallevitaj sur la okulojn. Fine, levinte per subita movo la brakojn, ŝi eltiris la pinglojn, subtenantaj ŝiajn harojn, kaj en unu momento, per unu kaposkuo, kovriĝis per ili, kiel per mantelo.

Akteo, proksimiĝinte kaj tuŝante ŝian malhelan hararon, diris:

— Ho, kiajn harojn ci havas!... Mi ne surŝutos ilin per ora pudro, oro jam trabrilas tie kaj ie iliajn ondojn. Nur kelkloke mi eble aldonos oran brilon, sed ete-ete, tiel ete, kvazaŭ radio ilin tralumus ... Mirinda estas sendube cia ligia lando, kie tiaj knabinoj naskiĝas.

— Mi tion ne memoras, — diris Ligia. — Urso al mi rakontis nur, ke tie estas arbaroj, arbaroj, arbaroj.

— Kaj en la arbaroj floroj floras, — diris Akteo, trempante la manojn en vazo, plena je verbeno, kaj verŝetante ĝin sur la harojn de la knabino.

Fininte tiun laboron, ŝi komencis laŭvice delikate ŝmiri ŝian korpon per aromaj oleoj el Arabujo, kaj poste kovris ĝin per senmanika, orkolora mola tuniko, sur kiun estis metota neĝblanka peplo. Sed ĉar antaŭe oni devis kombi la harojn, ŝi ĉirkaŭvolvis ŝin dume per speco de va-



sta vesto, nomata *synthesis*<sup>148</sup>, kaj, sidiĝinte sur seĝon, transdonis ŝin por momento en la manojn de sklavinoj, por rigardi de malproksime ŝian kombadon. Du sklavinoj komencis samtempe meti sur la malgrandajn piedojn de Ligia blankajn, purpure broditajn ŝuojn, kruce ŝnurante ilin ĉirkaŭ la alabastraj maleoloj. Kiam la kombado estis finita, oni ondигis sur ŝi peplon en belegajn faldojn, post kio Akteo, ferminte ŝnuron da perloj sur la kolo de Ligia kaj tuŝinte per ora polvo ŝiajn harbuklojn, ordonis vesti sin mem, dum la tuta tempo sekvante Ligian per ravitaj okuloj.

Sed baldaŭ ŝi estis preta, kaj ĵus kiam antaŭ la ĉefa pordego komencis aperi la unuaj portiloj, ili ambaŭ eniris en flankan kriptoportikon, el kie oni vidis la ĉefan enirejon, la internajn galeriojn kaj la korton, ĉirkaŭitan per kolonaro el numida marmoro.

Iom post iom ĉiam pli da homoj pasis sub la alta arko de la pordego, super kiu grandioza kvadrigo de Lizipo ŝajnis porti en aeron Apolonon kaj Dianon. La okulojn de Ligia frapis mirinda vidaĵo, pri kiu la modesta domo de Aŭlo povis doni al ŝi nenian imagon. La suno estis subiranta, kaj ĝiaj lastaj radioj falis sur la flavan, numidan marmoron de la kolonoj, kiu en tiuj lumoj brilis kiel oro,

---

<sup>148</sup> Voĉlegu [síntezis].

kaj kune nuancis rozkoloro. Inter la kolonoj, apud blankaj statuoj de Danaidinoj kaj aliaj, prezentantaj diojn aŭ heroojn, fluis amasoj da homoj, viroj kaj virinoj, egale similaj al statuoj, ĉar ĉirkaŭfalditaj per togoj, peploj kaj stoloj, gracie fluantaj malsupren en molaj ondoj, sur kiuj estingiĝadis la briloj de la subiranta suno. Giganta Herkulo, kies kapo estis ankoraŭ en lumo, de la brusto jam dronanta en ombro ĵetata de kolono, rigardis de supre la amason.

Akteo montris al Ligia senatanojn en larĝe borderitaj togoj, en koloraj tunikoj, kun kvaronlunoj sur la ŝuoj; kaj kavalirojn; kaj famajn artistojn; kaj romajn sinjorinojn, vestitajn jen rome, jen greke, jen per fantaziaj, orientaj vestoj, kun haroj frizitaj turforme aŭ piramide, aŭ kombitaj, simile al diinstatuoj, malalte ĉe la kapo, kaj ornamitaj per floroj. Dirante la nomojn de multaj viroj kaj virinoj, Akteo aldonadis al ili mallongajn kaj ofte terurajn historiojn, kiuj inspiris al Ligia timon, admiron, miregon. Tio estis por ŝi nova mondo, kies belecon ĝuis ŝiaj okuloj, sed kies kontrastojn ŝia knabina intelekto ne povis ekkompreni. En tiu vespera ruĝo sur la ĉielo, en tiuj vicoj da senmovaj kolonoj, perdiĝantaj for, malproksime, kaj en tiuj homoj, similaj al statuoj, estis ia grandega paco. Ŝajnis, ke inter tiuj rektliniaj marmoroj devus vivi iaj duondioj, liberaj de zorgoj, lulataj de trankvilo kaj feliĉaj; dume la mal-

laŭta voĉo de Akteo fojon post fojo malkovradis alian, teruran sekreton, tiel de la palaco, kiel de la homoj.

Jen tie, for, oni vidas la kriptoportikon, sur kies kolonoj kaj planko ruĝas ankoraŭ sangokoloraj makuloj de la sango, per kiu surŝprucis la blankajn marmorojn Kaligulo<sup>149</sup>, falante de la ponardo de Kasio Ĥereo<sup>150</sup>; tie oni murdis alian edzinon; tie la infanon oni disbatis kontraŭ la ŝtonoj; tie, sub tiu palacflanko, estas la subterejo, kie pro malsato mordis la fingrojn la juna Druzo; tie oni venenis la pli maljunan; tie en teruro sin tordis Gemelo<sup>151</sup>; tie konvulsiis Klaŭdio; tie, Germaniko<sup>152</sup>; ĉie tiuj muroj aŭdis ĝemojn kaj stertoradon de agoniantoj; kaj tiuj ĉi homoj, kiuj nun rapidas al la festeno en togoj, en koloraj tunikoj, en floroj kaj juveloj, estas eble morgaŭ kondamnotaj; eble sur pluraj vizaĝoj rideto kovras timon, maltrankvilon, necertecon pri la morgaŭo; eble febro, avideco, ĵaluzo mordas ĉi-momente la korojn de tiuj ekstervide senzorgaj, florkronitaj duondioj. La konfuzitaj pensoj de Ligia ne kapablis postkuri la vortojn de Akteo, kaj dum tiu belega mondo tiris

<sup>149</sup> «**Kaligulo.** Romia imperiestro post Tiberio, duonfrenezata tirano (12–41)» [NPIV] (lat. *Caligula*)

<sup>150</sup> *C. Cassius Chærea* (m. 41 p.K.) — tribunuso de la pretoriana gvardio, precipe konata kiel mortiginto de la imperiestro Kaligulo.

<sup>151</sup> *Ti. Gemellus* (19–37) — nepo de imperiestro Tiberio, mortigita laŭ ordono de Kaligulo.

<sup>152</sup> «**Germaniko.** Kromnomo de Roma konsulo kaj armeestro (*Ti. Drusus Nero*, 16 a.K.–19 p.K.)» [NPIV] (lat. *Germanicus*)

kun ĉiam pli granda forto ŝiajn okulojn, timo premis ŝian koron, kaj en la animo leviĝis subite nedirebla kaj senlima sopiro je la amata Pomponia Grecina kaj je la trankvila domo de Aŭlo, kie regis amo, ne krimo.

Dume de la strato Apolona alfluadis novaj ondoj da gastoj. El trans la pordego aŭdiĝadis bruo kaj ekkrioj de klientoj, akompanataj siajn patronojn. Sur la kortego, inter la kolonaroj, eksvarmis amasoj da imperiestraj sklavoj, sklavinoj, malgrandaj servoknaboj kaj pretoriaj soldatoj, garde postenantaj en la palaco. Kelkloke inter blankaj kaj brunetaj vizaĝoj eknigris vizaĝo de numido en plumhava kasko kaj kun grandaj oraj ringoj en la oreloj. Oni portis liutojn, citrojn, faskojn da floroj, arte kulturitaj malgraŭ la malfrua aŭtuno, manlampojn arĝentajn, orajn kaj kuprajn. Ĉiam pli laŭta bruo de interparoloj miksis sin kun plaŭdado de fontano, kies gutoŝnuroj, rozaj de la vesperaj briloj, falante de alte sur marmorojn, sin disbatis sur ili kvazaŭ plorĝeme.

Akteo ĉesis rakonti, sed Ligia rigardis plu, kvazaŭ serĉante iun en la amaso. Kaj subite ŝia vizaĝo kovriĝis per ruĝo. El inter la kolonoj elpaŝis Vinicio kaj Petronio kaj iris al la granda triklinio, belegaj, trankvilaj, similaj en siaj togoj al blankaj duondioj. Al Ligia, kiam ŝi ekvidis inter la fremdaj homoj tiujn du konatajn kaj amikajn vizaĝ-

ojn, ekŝajnis, ke granda ŝarĝo defalis de ŝia koro. Ŝi eksentis sin malpli soleca. Tiu granda sopiro al Pomponia kaj al la domo de Aŭlo, kiu leviĝis en ŝi antaŭ momento, subite ĉesis esti dolora. La tento vidi Vinicion kaj paroli kun li sufokis ĉiujn aliajn voĉojn. Vane ŝi rememorigis al si ĉian malbonon, kiun ŝi aŭdis pri la imperiestra palaco, kaj la vortojn de Akteo, kaj la avertojn de Pomponia; malgraŭ tiuj vortoj kaj avertoj ŝi eksentis subite, ke partopreni tiun festenon ŝi ne nur devas, sed volas: ĉe la penso, ke post momento ŝi ekaŭdos tiun simpatian kaj karan voĉon, kiu parolis al ŝi pri amo kaj pri feliĉo, inda je dioj, kaj kiu ĝis nun sonis en ŝiaj oreloj, kiel kanto, ekregis ŝin simple ĝojo.

Sed subite ŝi ektimis tiun ĝojon. Ekŝajnis al ŝi, ke en tiu momento ŝi perfidas tiun puran instruon, en kiu oni ŝin edukis, kaj Pomponian, kaj sin mem. Alia afero estas iri devigite, kaj alia — ĝoji pro tia nepreco. Ŝi eksentis sin kulpa, malinda kaj perdita.

Ekregis ŝin malespero kaj ŝi volis plori. Se ŝi estus sola, ŝi surgenuiĝus kaj komencus bati la bruston, ripetante: mia kulpo, mia kulpo! Akteo, preminte ŝin nun je la mano, kondukis ŝin tra internaj ĉambroj en grandegan triklinion, kie devis okazi la festeno, kaj sur ŝiaj okuloj kvazaŭ kuŝis nebulo, en la oreloj sonis bruo de internaj emocioj

kaj la korbatado sufokis la spiron. Kiel en sonĝo ŝi ekvidis mil lampojn, flagrantajn sur la tabloj, sur la muroj; kiel en sonĝo ŝi ekaŭdis ekkrion, per kiu oni salutis la imperiestron; kiel tra nebulo ŝi ekvidis lin mem. La ekkrio ŝin surdigis, blindigis ŝin la brilo, aromoj kapturnigis, kaj perdinte la reston de la konscio, ŝi apenaŭ povis distingi Akteon, kiu, lokinte ŝin ĉe la tablo, okupis mem apudan lokon.

Sed post momento malalta, konata voĉo aŭdiĝis de la alia flanko:

— Saluton al ci, plej bela el fraŭlinoj sur la tero kaj el steloj sur la ĉielo! Saluton al ci, dia Kallina!

Ligia, rekonsciiĝinte iom, ekrigardis: apud ŝi kuŝis Vinnicio.

Li ne surhavis togon, ĉar la oportuno kaj kutimo ordonis demeti togojn por festenoj. Lian korpon kovris nur skarлата senmanika tuniko, surbrodita per arĝentaj palmoj. Liaj brakoj estis nudaj, laŭ orienta kutimo ornamitaj per du larĝaj brakringoj, bukitaj super la kubutoj; sube — zorgeme senharigitaj, glataj, sed tro muskolaj, veraj brakoj de soldato, kreitaj por glavo kaj ŝildo. Sur la kapo li portis kronon el rozoj. Kun siaj brovoj, kunkreskantaj super la nazo, kun la mirindaj okuloj kaj bruneta vizaĝo li estis kvazaŭ enkorpiĝo de juneco kaj forto. Al Ligia li ekŝajnis tiel belega, ke kvankam ŝia komenca svenemo jam

pasis, ŝi apenaŭ kapablis respondi:

— Saluton al ci, Marko...

Kaj li diris:

— Feliĉaj estas miaj okuloj, kiuj cin vidas, feliĉaj la oreloj, kiuj aŭdis cian voĉon, pli dolĉan al mi ol la voĉo de flutoj kaj citroj. Se oni lasus min elekti, kiu kuŝu apud mi dum tiu ĉi festeno, ĉu ci, Ligia, aŭ Venero, mi elektus cin, ho dia!

Kaj li komencis rigardi ŝin, kvazaŭ volante satiĝi per ŝia bildo, kaj brulvundis ŝin per la okuloj. Lia rigardo glitis de ŝia vizaĝo sur la kolon kaj sur la malkovritajn brakojn, karesis ŝian belegan figuron, ĝuis ŝin, posedprenis kaj sorbis, sed, krom voluptemo, brilis en ĝi feliĉo kaj amo kaj admiro sen limo.

— Mi sciis, ke mi cin renkontos en la imperiestra palaco, — li parolis plu, — tamen, kiam mi cin ekvidis, tutan mian animon ekskuis tia ĝojo, kvazaŭ neatendita feliĉo min trafus.

Ligia, rekonsciiĝinte kaj sentante, ke en ĉi tiu amaso kaj en ĉi tiu domo li estas la sola estaĵo proksima al ŝi, komencis paroli kun li kaj demandi pri ĉio, kio estis por ŝi nekomprenebla kaj kio inspiris al ŝi timon. De kie li sciis, ke li trovos ŝin en la imperiestra palaco, kaj kial ŝi estas ĉi tie? Kial la imperiestro forprenis ŝin de Pomponia? Ĉi tie

ŝi timas kaj volas reveni al ŝi. Ŝi mortus pro sopiro kaj maltrankvilo, se ŝi ne esperus, ke Petronio kaj li propetos pri ŝi la imperiestron.

Vinicio klarigis al ŝi, ke pri ŝia forkapto li eksciis de Aŭlo mem. Kial ŝi estas ĉi tie, li ne scias. La imperiestro antaŭ neniu pravigas siajn decidojn kaj ordonojn. Ŝi tamen ne timu. Jen li, Vinicio, estas apud ŝi kaj restos apud ŝi. Li preferus perdi la okulojn ol ŝin ne vidi, li preferus perdi la vivon ol ŝin forlasi. Ŝi estas lia animo, li do gardos ŝin, kiel la propran animon. Li konstruos al ŝi en sia hejmo altaron, kiel al sia diino, li oferados sur ĝi mirhon kaj aloon, kaj printempe anemonojn kun pomfloroj ... Kaj ĉar ŝi timas la imperiestran palacon, li promesas al ŝi, ke en ĉi tiu domo ŝi ne restos.

Kvankam li parolis elturniĝeme kaj fojfoje trompe, en lia voĉo estis sentebla vero, ĉar liaj sentoj estis veraj. Iom post iom ekposedis lin sincera kompatato kaj ŝiaj vortoj penetris en lian animon tiel, ke kiam ŝi komencis danki lin kaj certigi, ke Pomponia ekamis lin pro lia boneco kaj ŝi mem estos danka al li dum la tuta vivo, li ne povis ekregisian kortuŝon kaj ŝajnis al li, ke neniam en la vivo li scios rifuzi ŝian peton. Lia koro komencis degeli. Ŝia beleco ebriigis liajn sentojn kaj li avidis ŝin, sed ankaŭ konsciis, ke ŝi estas al li tre kara kaj ke vere li povas ŝin adori, kiel



diinon; li sentis ankaŭ neregeblan bezonon paroli al ŝi pri ŝia beleco kaj pri sia amo al ŝi, kaj ĉar la festena bruo laŭtiĝadis, tial, alŝovinte sin pli proksimen, li komencis flustri al ŝi vortojn bonajn, dolĉajn, fluantajn el la fundo de la animo, sonantajn kiel muziko, kaj ebriigajn kiel vino.

Kaj li ebriigadis ŝin. Inter ĉiuj tiuj fremduloj, kiuj ŝin ĉirkaŭis, li ŝajnis al ŝi ĉiam pli proksima, pli aminda, kaj tute certa kaj tutanime sindona. Li trankviligis ŝin, promesis eligi el la imperiestra palaco; li promesis, ke li ŝin ne forlasos, ke li servos al ŝi. Krom tio, antaŭe, en la hejmo de Aŭlo li parolis al ŝi nur ĝenerale pri amo kaj pri feliĉo, kiun ĝi povas doni, kaj nun li diris jam rekte, ke li amas ŝin, ke ŝi estas por li plej kara kaj plej amata. La unuan fojon Ligia aŭdis tiajn vortojn el vira buŝo, kaj dum ŝi aŭskultis, ĉiam pli ŝajnis al ŝi, ke io en ŝi vekigis el dormo, ke ekposedas ŝin ia feliĉo, en kiu senlima ĝojo miksas sin kun senlima maltrankvilo. Timo ŝin kaptis, ke tiajn parolojn ŝi aŭskultas, sed por nenio en la mondo ŝi volus preterlasi eĉ unu vorton. Fojfoje ŝi malle vadis la okulojn, kaj jen levadis al Vinicio rigardon lumplenan, timeman kaj kune demandan, kvazaŭ ŝi dezirus diri al li: «parolu plu!» La bruo, la muziko, la odoro de floroj kaj la odoro de arabaj incensoj denove komencis turni ŝian kapon. Estis en Romo kutimo kuŝi ĉe festenoj, sed hejme Li-

gia okupadis la lokon inter Pomponia kaj la malgranda Aŭlo, kaj nun kuŝis apud ŝi Vinicio, juna, grandega, amplena, ardanta, kaj ŝi, sentante la brulon, kiu de li radiis, spertis kune honton kaj volupton. Ŝin ekregadis ia senforteco, ia svenemo kaj forgesemo, kvazaŭ dormo estus ŝin kaptanta.

Sed ankaŭ lin komencis influi ŝia apudesto. Lia vizaĝo paliĝis. La nazo sin disblovis, kiel tiu de orienta ĉevalo. Videble ankaŭ lia koro batis sub la skarлата tuniko per neordinara ritmo, ĉar lia spiro iĝis mallonga kaj vortoj sin ŝiris en la buŝo. Ankaŭ li la unuan fojon estis apud ŝi tiel senpere. Liaj pensoj komencis miksiĝi; en la vejnoj li sentis fajron, kiun vane li volis estingi per vino. Ne la vino ankoraŭ, sed ŝia belega vizaĝo, ŝiaj nudaj brakoj, ŝia knabina brusto, ondanta sub la ora tuniko, kaj ŝia figuro, kaŝita en la blankaj faldoj de la peplo, ebriigadis lin ĉiam pli. Fine li ĉirkaŭprenis ŝian manon super la artikoj, kiel li foje jam faris en la domo de Aŭlo, kaj tirante ŝin al si, komencis flustri per tremantaj lipoj:

— Mi amas cin, Kallina ... dia mia!

— Marko, lasu min, — diris Ligia.

Kaj li parolis plu kun okuloj, kovritaj de nebulo:

— Dia mia! Amu min!...

Sed en la sama momento aŭdigis la voĉo de Akteo, kiu

kuŝis aliflanke de Ligia:

— La imperiestro vin rigardas.

Vinicion kaptis subita kolero tiel kontraŭ Nerono, kiel kontraŭ Akteo. Jen ŝia voĉo dispelis la sorĉon de la rav-ekscito. Al la juna viro eĉ amika voĉo ŝajnus en tiu momento trudema, kaj li pensis, ke Akteo intence volas malhelpi lian interparolon kun Ligia.

Do, levinte la kapon kaj rigardinte la junan liberigitinon super la ŝultroj de Ligia, li diris kolere:

— Pasis la tempo, Akteo, kiam ci kuŝadis dum festenoj apud la imperiestro, kaj oni diras, ke minacas cin blindeco, kiel do ci povas lin vidi?

Kaj ŝi respondis, kvazaŭ kun malĝojo:

— Mi vidas lin tamen ... Ankaŭ li estas miopa kaj rigardas vin tra la smeraldo.

Ĉio, kion faris Nerono, ekscitadis gardemon eĉ de plej proksimaj al li personoj, tial Vinicio maltrankviliĝis, rekonsciiĝis — kaj komencis kaŝe rigardi al Nerono. Ligia, kiu en la komenco de la festeno vidis lin, pro konfuzo, kiel tra nebulo, kaj poste, absorbite per la ĉeesto kaj interparolo de Vinicio, tute lin ne rigardis, nun turnis al li siajn kune scivolajn kaj timigitajn okulojn.

Akteo diris la veron. Nerono, klinite super la tablo, duonferminte unu okulon, kaj ĉe la alia tenante per la

finroj rondan, poluritan smeraldon, kiun li konstante uzadis, rigardis ilin. Por momento lia rigardo renkontis la okulojn de Ligia, kaj la koro de la knabino premiĝis de teruro. Kiam, ankoraŭ en la infaneco, ŝi estis en la sicilia bieno de Aŭlo, maljuna egipta sklavino rakontadis al ŝi pri drakoj, loĝantaj en montaraj abismoj, kaj jen nun ekŝajnis al ŝi, ke ekrigardis ŝin subite verdeta okulo de tia drako. Ŝi kaptis per la mano la manon de Vinicio, kiel infano, kiu timas, kaj en ŝian kapon ekpemis sin senordaj kaj rapidaj impresoj: do tio estas li? La terura kaj ĉiopova? Neniam ŝi vidis lin antaŭe, kaj ŝi imagis, ke li aspektas alie. Ŝi prezentis al si ian teruran vizaĝon, kun krueleco ŝtone fiksita en la trajtoj; dume ŝi ekvidis grandegan, sur dika nuko bazitan kapon, teruran, vere, sed preskaŭ ridindan, ĉar similan de malproksime al kapo de infano. Tuniko de ametista koloro, malpermesita al simplaj mortemuloj, reflektis bluetan brilon sur lian larĝan kaj mallongan vizaĝon. Li havis harojn malhelajn, frizitajn laŭ la modo enkondukita de Otono, en kvar vicojn da bukloj. Barbon li ne havis, ĉar antaŭ nelonge li oferis ĝin al Jovo, pro kio la tuta Romo esprimadis al li dankojn, kvankam kaŝe oni flustris, ke li oferdonis ĝin tial, ke ĝi kreskis, kiel ĉe ĉiuj el lia familio, rufa. En lia frunto, forte elstaranta super la brovoj, estis tamen io olimpa. En la kuntiritaj brovoj oni vidis konsci-

on pri ĉiopovo; sed sub tiu frunto de duondio troviĝis vizaĝo de simio, drinkulo kaj histriono, vanta, plena je sinŝanĝaj avidoj, ŝvela de graso, kaj tamen malsanema kaj senhonta. Al Ligia li ekŝajnis malbonaŭgura, sed antaŭ ĉio abomena.

Post momento li metis la smeraldon kaj ĉesis ŝin rigardi. Tiam ŝi ekvidis liajn konveksajn, bluajn okulojn, fermetiĝantajn pro troo da lumo, vitrosimilajn, sen penso, kiel la okuloj de mortintoj.

Kaj li, turninte sin al Petronio, diris:

— Ĉu tio estas la garantiulino, kiun amas Vinicio?

— Estas ŝi, — respondis Petronio.

— Kiel nomas sin ŝia nacio?

— Ligioj.

— Kaj Vinicio opinias ŝin bela?

— Vestu per virina peplo putrintan olivarban ŝtipon, kaj Vinicio trovos ĝin belega. Sed sur cia vizaĝo, ho senkompara konanto, mi legas jam verdikton pri ŝi! Ci ne bezonas ĝin anonci! Jes! Tro seka, malgrasaĉa, vera papavo sur maldika trunketo, kaj ci, dia estetikulo, ŝatas en virino antaŭ ĉio la trunkon, kaj trioble, kvaroble ci pravas! La nura vizaĝo nenion signifas. Mi multe lernis de ci, sed tiel seneraran juĝon de la okulo mi ankoraŭ ne havas ... Kaj mi estas preta veti kun Tulio Seneciono je lia amatino, ke

kvankam dum la festeno, kiam ĉiuj kuŝas, malfacile estas juĝi pri la tuta figuro, ci jam diris al ci: «tro mallarĝa en la koksoj!»

— Tro mallarĝa en la koksoj, — respondis Nerono, duonfermante la okulojn.

Sur la buŝo de Petronio aperis apenaŭ rimarkebla rideto, kaj Tulio Seneciono, kiu ĝis tiu momento estis okupita de interparolo kun Vesteno<sup>153</sup>, aŭ pli ĝuste per mokado de songoj, je kiuj Vesteno kredis, diris:

— Ci eraras! — mi partias kun Cezaro.

— Bone, — respondis Petronio. — Mi estis ĝuste pruvanta, ke ci havas eron da saĝo, kaj Cezaro asertas, ke ci estas kompleta azeno.

— *Habet!*<sup>154</sup> — diris Nerono, ridante kaj turnante mal-supren la dikfingron, kiel oni faris en cirkoj, signe, ke gladiatoro ricevis baton kaj ke li estu finmortigita.

Kaj Vesteno, opiniante ke oni plu parolas pri songoj, ekkriis:

— Mi tamen kredas je songoj, kaj Seneko diris al mi iam, ke ankaŭ li kredas.

— La lastan nokton mi songis, ke mi iĝis vestalo, — diris, sin klinante super la tablon, Kalvia Krispinilla.

<sup>153</sup> *M. Julius Vestinus Atticus* (m. 41 p.K.) — Romia politikisto, amiko de Nerono, konsulo de la jaro 65<sup>a</sup>.

<sup>154</sup> *habet* (lat.) — li havas; ĉi tie: trafite!

Je tio Nerono komencis klaki per la manoj, aliaj sekvis lian ekzemplon, kaj dum momento ĉirkaŭe sonis aplaŭdoj, ĉar Krispinilla, kelkfoja eksedzino, estis konata pro sia nekredbla malĉasteco en la tuta Romo.

Sed ŝi, tute ne konfuzite, diris:

— Kion do! Ili ĉiuj estas maljunaj kaj malbelaj. Sole Rubria similas al homoj, kaj tiel ni estus du, kvankam eĉ Rubria somere ricevas lentugojn.

— Konfesu tamen, ĉastega Kalvia, — diris Petronio, — ke iĝi vestalo ci povis nur en songo.

— Kaj se Cezaro ordonus?

— Mi ekkredus, ke realiĝas songoj eĉ plej strangaj.

— Ĉar ili realiĝas, — ekkriis Vesteno. — Mi komprenas homojn, kiuj ne kredas je la dioj, sed kiel oni povas ne kredi je songoj!

— Kaj aŭguroj? — demandis Nerono. — Oni iam aŭguris al mi, ke Romo ĉesos ekzisti, kaj mi regos super la tuta Oriento.

— Aŭguroj kaj songoj, — tio ligas sin kune, — diris Vesteno. — Foje prokonsulo, granda nekredanto, sendis en la templon de Mopso sklavon kun sigelita letero, kiun li malpermesis malfermi por kontroli, ĉu la dio scios respondi al la demando, farita en la letero. La sklavo dormis nokte en la templo por havi aŭguran songon, post kio li

revenis kaj diris la jenon: Mi vidis en songo junulon, helan, kiel la suno, kiu diris al mi nur unu vorton: «Nigran». La prokonsulo, aŭdinte tion, paliĝis — kaj, turnante sin al siaj gastoj, egalaj nekreduloj, diris: «Ĉu vi scias, kio estis en la letero?»

Ĉi tiam Vesteno haltis kaj, levinte pokalon kun vino, komencis trinki.

— Kio estis en la letero? — demandis Seneciono.

— En la letero estis la demando: «Kian virbovon mi oferu: ĉu blankan, aŭ nigran?»

Sed la intereson, ekscititan de la rakonto, interrompis Vitelio, kiu, veninte jam iom ebria al la festeno, sen iu kaŭzo eksplodis subite per senpensa rido.

— Kial ridas tiu barelo da sebo? — demandis Nerono.

— Rido distingas homojn de bestoj, — diris Petro-  
nio, — kaj li ne havas alian pruvon, ke li ne estas virpor-  
ko.

Vitelio interrompis ekridon je duono, kaj, ŝmacante per la lipoj, brilantaj de saŭcoj kaj grasoj, komencis rigardi la ĉeestantojn kun tia mirego, kvazaŭ li neniam antaŭe vidus ilin.

Poste, levinte sian kusensimilan manon, li diris per raŭka voĉo:

— Mi perdis de la fingro kavaliran ringon, hereditan



de la patro.

— Kiu estis ŝuisto, — aldonis Nerono.

Sed Vitelio denove eksplodis per neatendita rido kaj komencis serĉi la ringon en la peplo de Kalvia Krispinilla.

Je tio Vatinio komencis ŝajnigi ekkriojn de timigita virino, kaj Nigidia, amikino de Kalvia, juna vidvino kun vizaĝo de malĉastulino, diris laŭte:

— Li serĉas tion, kion li ne perdis.

— Kaj kio neniel al li utilos, eĉ se li ĝin trovos, — finis la poeto Lukano.

La festeno iĝadis pli gaja. Amasoj da sklavoj disportadis ĉiam novajn manĝojn; el grandegaj ujoj, plenigitaj per neĝo kaj ĉirkaŭvolvitaj per hedero, oni ĉiumomente eltiradis malpli grandajn kruĉojn kun multspecaj vinoj. Ĉiuj drinkis abunde. Sur la tablon kaj sur la festenanojn de la plafono fojon post fojo faladis rozoj.

Petronio komencis tamen peti Neranon, ke antaŭ ol la gastoj ebriiĝos, li donu brilon al la festeno per sia kanto. Ĥoro da voĉoj subtenis liajn vortojn, sed Nerono komencis rezisti. Tio ne estas nur la afero de kuraĝo, kvankam ĉiam ĝi mankas al li ... La dioj scias, kiom kostas al li ĉiaj sinprezentoj ... Li, vere, ne deklinas sin de ili, ĉar oni devas ja ion fari por la arto, kaj se Apolono donacis al li certan voĉon, la dian favoron ne decas ja lasi senuze. Li eĉ

komprendeblas, ke ĝi estas lia devo rilate al la regno. Sed hodiaŭ li vere estas raŭka. Nokte li metis sur la bruston plumbajn pezilojn; sed ankaŭ tio ne helpis ... Li eĉ intencas veturi en Ancion<sup>155</sup> por iom spiri la maran aeron.

Sed Lukano komencis lin petegi, en la nomo de la arto kaj de la homaro. Ĉiuj scias, ke la dia poeto kaj kantisto komponis novan himnon al Venero, kompare kun kiu tiu de Lukrecio estas nur hurletado de jara lupido. Estu ĉi tiu festeno vera festeno. Regnestro bona, kiel li, ne devas tiel suferigi siajn subulojn: «Ne estu kruela, Cezaro!»

— Ne estu kruela! — ripetis ĉiuj, sidantaj pli proksime.

Nerono dismetis la manojn, signe, ke li devas cedi. Tiam ĉiuj vizaĝoj alprenis la esprimon de danko, kaj ĉiuj okuloj direktis sin al li. Sed li jam antaŭe ordonis sciigi Popean, ke li kantos, kaj diris al la ĉeestantoj, ke ŝi ne venis al la festeno, ĉar ŝi ne sentis sin sana, ĉar tamen neniu kuracilo tiel helpas al ŝi, kiel lia kanto, li ne volus senigi ŝin je la okazo.

Popea baldaŭ venis, efektive. Ŝi regis ĝis nun Neronon, kiel subulon, ŝi tamen sciis, ke kiam estis concernata lia memamo de kantisto, ĉaristo aŭ poeto, danĝere estus ĝin inciti. Ŝi eniris do, belega, kiel diino, vestita, kiel Ne-

<sup>155</sup> Latine *Antium*, nun la itala *Anzio*, havenurbo sur la bordo de Tirena maro, 50 km suden de Romo. En tiea imperiestra palaco naskiĝis Kaligulo kaj Nerono.

rono, per ametistkolora vesto kaj kolĉeno el grandegaj perloj, militabitaj iam disde Masenseno<sup>156</sup>, orhara, dolĉa, kaj kvankam dufoja eksedzino, havanta la vizaĝon kaj aspekton de virgulino.

Oni salutis ŝin per ekkrioj kaj per la titolo «dia aŭgustino». Ligia neniam en la vivo vidis iun egale belan, kaj apenaŭ ŝi kredis siajn okulojn, ĉar ŝi sciis, ke Popea Sabena estis unu el plej malbonaj virinoj en la mondo. Ŝi sciis de Pomponia, ke ŝi, Popea instigis Neronon mortigi la patrinon kaj la edzinon, ŝi konis ŝin el rakontoj de gastoj kaj servistoj de Aŭlo; ŝi aŭdis, ke ŝiajn statuojn oni nokte falgadis en la urbo; ŝi aŭdis pri surskriboj, kies aŭtorojn oni kondamnadis je plej severaj punoj, kaj kiuj tamen reaperadis ĉiumatene sur la urbaj muregoj. Dume nun, ĉe la ekvido de tiu misfama Popea, konsiderata de la konfesantoj de Kristo kiel enkorpiĝo de malbono kaj krimo, ekŝajnis al ŝi, ke tiel povas aspekti anĝeloj aŭ ĉielaj spiritoj. Ŝi simple ne povis forturni de ŝi la rigardon, kaj el ŝia buŝo senvole elŝiris sin la demando:

— Ho, Marko, ĉu tio povas esti?

Sed li, ekscitita de vino kaj kvazaŭ senpacienca, ke tiom da aferoj malkoncentris ŝian atenton kaj forturnis ĝin de li, diris:

---

<sup>156</sup> Berbere *Masensen*, Latine *Massinissa* (m. 148 a.K.) — la unua reĝo de Numidio.

— Jes, ŝi estas bela, sed ci estas miloble pli bela. Ci cin ne konas, alie ci enamiĝus je ci mem, kiel Narciso ... Ŝi banas sin en lakto de azeninoj, sed cin kredeble Venero banis en la propra. Ci cin ne konas, *ocelle mi!*...<sup>157</sup> Ne rigardu ŝin. Al mi turnu la okulojn, *ocelle mi!*... Tuŝu per cia buŝo ĉi tiun vinpokalon, kaj mi poste samloken almetos la mian...

Li aliĝadis ĉiam pli proksimen, kaj ŝi komencis forŝovi sin al Akteo. Sed en tiu momento oni ordonis silenton, ĉar la imperiestro leviĝis. Kantisto Diodoro prezentis al li liuton el la speco nomata *delto*<sup>158</sup>; alia, Terpno, akompananta lian ludon, proksimiĝis kun instrumento nomata *nablo*<sup>159</sup>, kaj Nerono, apoginte la delton kontraŭ la tablo, levis supren la okulojn, kaj post momento en la triklinio regis silento, interrompata sole de la brueto de la rozoj, senĉese falantaj de la plafono.

Post tio li komencis kanti, aŭ pli ĝuste deklami kante kaj ritme, ĉe akompano de la du liutoj, sian himnon al Venero. Nek la voĉo, kvankam iom malklara, nek la versaĵo estis malbonaj, tiel ke la kompatindan Ligian denove kaptis riproĉoj de la konscienco, ĉar la himno, kvankam glo-

<sup>157</sup> *ocelle mi* (lat.) — okuleto mia (karesa esprimo).

<sup>158</sup> **delta, delto**<sup>z</sup> — la greka litero Δ, grafike triangula; ĉi tie do, liuto deltoforma.

<sup>159</sup> Fenica harpo, greke váβλα; inverse ol pri *delto*, la matematikistoj eknomis sian simbolon ∇ laŭ la greka nomo de tiu muzikilo.

ranta la malpuran idolanan Veneron, ŝajnis al ŝi eĉ tre bela, kaj la imperiestro mem, kun sia laŭrokrono ĉirkaŭ la frunto kaj levitaj okuloj, prezentis sin al ŝi pli majesta, multe malpli terura kaj malpli abomena ol en la komenco de la festeno.

La festenanoj respondis per tondro da aplaŭdoj. La ek-krioj: «Ho, ĉiela voĉo!» aŭdigis ĉirkaŭe; kelkaj el la virinoj, levinte supren la manojn, restis tiel, signe de ravo, eĉ post la fino de la kanto; aliaj viŝis la larme malsekajn okulojn; la tuta salonego ekbolis, kiel en abelujo. Popea, klininte sian orharan kapeton, levis al la buŝo la manon de Nerono, kaj tenis ĝin longe en silento, kaj la juna Pitagoro, mirinde bela greko, tiu sama, kun kiu poste jam duone freneza Nerono ordonis al pastroj ligi lin per edziĝa ligo, laŭ ĉiuj ritoj, nun surgenuiĝis ĉe liaj piedoj.

Sed Nerono rigardis atente Petronion, kies laŭdojn li ĉiam deziris antaŭ ĉio, kaj tiu diris:

— koncerne la muzikon, Orfeo estas nun sendube tiel flava pro envio, kiel Lukano ĉeestanta ĉi tie, kaj rilate al la versoj, mi bedaŭras, ke ili ne estas pli malbonaj, ĉar tiam mi trovus eble konvenajn laŭdesprimojn por ili.

Lukano neniom koleriĝis je li pro la aludo pri envio — kontraŭe, li rigardis lin dankeme kaj, ŝajnigante malbonan humoron, komencis murmuri:

— Malbenita fato, kiu ordonis al mi vivi samtempe kun tia poeto. Mi havus, forgesota homo, lokon en la homa memoro kaj sur Parnaso, kaj nun mi estingiĝos, kiel estingiĝas stumpo ĉe la suno.

Petronio tamen, kiu havis mirindan memoron, komencis ripeti fragmentojn el la himno, citi apartajn versojn, glori kaj analizi pli belajn esprimojn. Lukano, kvaŝaŭ forgesinte la envion pro la ĉarmo de la poezio, aldonis al liaj vortoj siajn ravesprimojn. Sur la vizaĝo de Nerono bildiĝis plezurego kaj senlima vanteco, ne nur parenca al malsaĝeco, sed tute kun ĝi egala. Li mem sufloris al ili la versojn, kiujn li opiniis la plej belaj, kaj fine li komencis konsoli Lukanon kaj diri al li, ke li ne perdu la kuraĝon, ĉar kvankam kio oni naskiĝis, tio oni estas, tamen la kulto, kiun la homoj montras al Jovo, ne esceptas kulton al aliaj dioj.

Poste li leviĝis por forkonduki Popean, kiu, efektive nebone fartante, deziris foriri. Al la festenanoj, kiuj restis, li ordonis tamen denove okupi la lokojn, kaj antaŭdiris, ke li revenos. Efektive li revenis post momento por ebrigadi sin per la fumo de incensoj kaj rigardi la pluajn spektaklojn, kiujn li mem, Petronio aŭ Tigeleno preparis por la festeno.

Denove oni legis versaĵojn aŭ aŭskultis dialogojn, en

kiuj ekstravaganco anstataŭis spritecon. Poste fama mikisto, Pariso, prezentis la aventurojn de Ioo<sup>133</sup> la filino de Inaño<sup>162</sup>. Al la gastoj, precipe al Ligia, ne kutiminta al similaj spektaloj, ŝajnis, ke ili vidas miraklojn kaj sorĉojn. Pariso sciis per movoj de la manoj kaj de la korpo esprimi aferojn, ŝajne neesprimeblajn en danco. Liaj manplatoj nebuligis la aeron, formante nubon luman, vivan, tremantan, volupteman, ĉirkaŭantan duone svenintan knabinan figuron, skuatan de volupta spasma. Ĝi estis bildo, ne danco, bildo klara, malkaŝanta la misterojn de amo, sorĉa kaj senhonta, kaj kiam post ĝia fino eniris cibelpastroj kaj komencis kun siriaj knabinoj, ĉe akompano de citroj, flutoj, cimbaloj kaj tamburiletaj bakĥan dancon, plenan je sovaĝaj krioj kaj de ankoraŭ pli sovaĝa malĉasto, ŝajnis al Ligia, ke viva fajro ŝin bruligos, ke tondro devus frapi ĉi tiun domon, aŭ plafono devus fali sur la kapojn de la festenanoj.

Sed el la ora retego, streĉita sub la plafono, faladis nur rozoj, kaj dume la jam duonebria Vinicio diris al ŝi:

— Mi vidis cin en la domo de Aŭlo ĉe la fontano kaj mi ekamis cin. Estis tagiĝo kaj ci pensis, ke neniu rigardas, sed mi cin vidis ... Kaj mi vidas cin tia ĝis nun, kvan-

<sup>133</sup> **Ioo**, gr. ἰώ (ankaŭ **Iono** [QE], **Io** [NPIV], **Io** [PIV]) estis reĝidino el la greka urbo Argo, amatino de Zeŭso kaj praulino de Heraklo.

<sup>162</sup> «**Inaño** (mit.) La unua reĝo de Argo.» [NPIV]

kam la peplum kovras cin de miaj okuloj. Ĵetu for la peplon, kiel Krispinilla. Vidu! Dioj kaj homoj serĉas amon. Nenio estas, krom ĝi, en la mondo! Metu la kapon sur mian bruston kaj fermu la okulojn!

Kaj ŝiaj pulsoj batis peze en la tempioj kaj manoj. Kaptis ŝin la impresoj, ke ŝi falas en ian abismon, kaj tiu Vinicio, kiu ŝajnis antaŭe tiel proksima kaj fidinda, anstataŭ savi, tiras ŝin profunden. Kaj ŝia koro premiĝis kontraŭ li. Denove ŝi komencis timi la festenon, kaj lin, kaj sin mem. Iu voĉo, simila al la voĉo de Pomponia, vokis en ŝia animo: «Ligia! savu cin!», sed io parolis al ŝi ankaŭ, ke jam estas tro malfrue, ke kiun simila fajro ĉirkaŭblovis, kiu vidis ĉion, kio okazis dum ĉi tiu festeno, en kiu la koro tiel batis, kiel en ŝi ĝi batis, kaj kiun traigis tia tremo, kia ŝin traigis ĉe lia proksimiĝo — tiu estas perdita senrevoke. Ŝi sentis sin svene. Fojfoje ŝajnis al ŝi, ke ŝi perdos la konscion, kaj poste okazos io terura. Ŝi sciis, ke neniu rajtis, minacate de la imperiestra kolero, levi sin de la festeno, antaŭ ol la imperiestro sin levis, sed eĉ se ne estus tiel, ŝi ne havis jam forton por tio.

Dume la fino de la festeno estis ankoraŭ malproksima. Sklavoj alportadis ankoraŭ novajn manĝojn kaj senĉese plenigadis la pokalojn per vino, kaj antaŭ la tabloj, starantaj en formo de unuflanke malfermita cirklo, aperis du



atletoj por prezenti al la gastoj luktospektaklon.

Kaj tuj ili ekbatalis. La potencaj korpoj, brilantaj de olivoleo, faris unu bulegon, iliaj ostoj kraksonis en la feraj brakoj, el la kunpremitaj makzeloj eliĝadis malbonaŭgura grinco. Fojfoje oni aŭdis rapidajn, obtuzajn frapojn de iliaj piedoj sur la planko, surŝutita de safrano, jen ili haltadis senmove en silento, kaj al la spektantoj ŝajnis, ke ili vidas antaŭ si grupon, skulptitan el ŝtono. La okuloj de la romanoj kun plezuro observis la penadon de la terure streĉitaj dorsoj, kruroj kaj brakoj. Sed la lukto ne daŭris longe, ĉar Krotono, majstro kaj estro de gladiatora lernejo, ne vane ĝuis la opinion de la plej forta homo en la regno. Lia kontraŭulo komencis spiri ĉiam pli rapide, poste stertori, poste lia vizaĝo iĝis ruĝeblua, fine sango elŝprucis el lia buŝo, kaj li malstreĉiĝis.

Tondro da aplaŭdoj salutis la finon de la lukto, kaj Krotono, apoginte la piedojn sur la dorso de la kontraŭulo, krucigis la grandegajn brakojn sur la brusto kaj rigardis ĉirkaŭen tra la ĉambrego per la okuloj de triumfanto.

Poste eniris imitistoj de bestoj kaj de iliaj voĉoj, ĵonglistoj kaj arlekenoj, sed oni malmulte ilin rigardis, ĉar vino nebuligis jam la okulojn de la spektantoj. La festeno aliformis sin iom post iom en drinkan kaj diboĉan orgion. La siriaj knabinoj, kiuj antaŭe dancis la bakĥan dancon,

sin miksis kun la gastoj. La muziko ŝanĝiĝis en senordan kaj sovaĝan bruadon de citroj, liutoj, armenaj cimbaloj, egiptaj sistroj, trumpetoj kaj kornoj, kaj ĉar kelkaj el la festenanoj deziris babilo, oni komencis krii al la muzikistoj, ke ili iru for. La aero, saturita je odoro de floroj, plena je aromo de oleoj, kiujn belegaj servoknabetoj ŝprucigis dum la festeno sur la piedojn de la gastoj, saturita je safrano kaj per homaj elspiraĵoj, iĝis sufoka; la lampoj brilis per malfortaj flamoj, malrektiĝis la florkronoj sur la fruntoj, la vizaĝoj paliĝis kaj kovriĝis per ŝvitgutoj.

Vitelio peze falis sub la tablon. Nigidia, nudiginte sin ĝis duono de la korpo, apogis sian ebrian, infanan kapon sur la bruston de Lukano, kaj li, egale ebria, komencis forblovi oran pudron de ŝiaj haroj, levante la okulojn supren kun senlima kontenteco. Vesteno kun la obstineco de ebruulo ripetis dekafoje la respondon de Mopso al la sigelita letero de la prokonsulo, kaj Tulio, kiu mokis la diojn, parolis per voĉo longiĝema, interrompata de singulto:

— Ĉar se la Sferoso de Ksenofano<sup>161</sup> estas sfera, tiam, vidu, tian dion oni povas ruli antaŭ si per la piedo, kiel barelon.

<sup>161</sup> La malnovgreka poeto, humoristo kaj filozofo Ksenofano (gr. Ξενοφάνης, ĉ. 570–478 a.K.) mokis antropomorfismon kaj hierarkion inter la dioj; ĉiuj dioj devas esti egalaj, ĉar alie nur la plej grava meritis la rangon de Dio; tial la aron da dioj oni metafore konceptu kiel sferon (nomeblan *Sferoso*) kies punktoj egale distancas disde la centro.

Sed Domicio Afro, maljuna ŝtelisto kaj denuncisto, indigniĝis pro tiu parolo, kaj pro indigno surverŝis per falerno<sup>162</sup> sian tutan tunikon. Li ĉiam kredis je la dioj. Homoj diras, ke Romo pereos, kaj estas eĉ iuj, kiuj asertas, ke ĝi jam pereas. Certe jes! Sed se tio venos, ĝi estos tial, ke la junularo ne havas plu la kredon, kaj sen la kredo ne povas ekzisti virto. Oni forlasis ankaŭ la iamajn severajn morojn, kaj en nenies kapon venas la penso, ke la epikuranoj ne kapablos rezisti al barbaroj. Kaj tio estas ja senduba! Koncerne lin, li bedaŭras, ke li ĝisvivis tian tempon, kaj ke en ĝuoj li devas serĉi helpon kontraŭ ĉagrenoj, kiuj alie rapide subigus lin.

Dirinte tion, li alpremis al si sirian dancistinon kaj per la sendenta buŝo komencis kisi ŝian nukon kaj dorson, kion vidante, konsulo Memmio Regulo ekridis kaj, levinte sian kalvan kapon, ornamitan per flankeniĝinta florkrono, ekparolis:

— Kiu diras, ke Romo pereas?... — Sensencaĵo!... Mi, konsulo, scias plej bone ... *Videant consules...*<sup>163</sup> tridek leĝoj gardas nian *pax romana!*<sup>164</sup>

Ĉe tiuj vortoj li almetis la pugnojn al la tempioj kaj

<sup>162</sup> «**Falerno.** Italia regiono...: *Falerna vino.*» [NPIV]

<sup>163</sup> *videant consules!* [videant konsules] (lat.) — gardu, ŝtatestroj! (formulo, per kiu la roma senato sin turnis al du ĉefŝtatestroj, kiam la ŝtato troviĝis en danĝero).

<sup>164</sup> *pax romana* [paks romana] (lat.) — paco roma.

komencis krii tra la tuta ĉambrego:

— Tridek legioj! — tridek legioj! De Britujo ĝis la limo de Partujo!

Sed subite li haltis pripense kaj, almetinte la fingron al la frunto, diris:

— Eble eĉ, pli ĝuste, tridek du...

Kaj li ruliĝis sub la tablon, kie post momento li komencis vomi fenikopteraĵojn, rostitajn agarikojn, glaciigitajn fungojn, akridojn kun mielo, fiŝojn, viandojn kaj ĉion, kion li manĝis aŭ trinkis.

Domicion tamen ne trankviligis la nombro de la legioj, gardantaj la romian pacon: «Ne, ne! Romo devas pereji, ĉar pereis la kredo je la dioj kaj la severaj moroj! Romo devas pereji! Domaĝe, ĉar la vivo tamen estas bona, la imperiestro favora, la vino bongusta! Ha, kia domaĝo!»

Kaj, kaŝinte la kapon inter la skapolojn de la siria bakĥistino, li komencis plori:

— Kion gravas la estonta vivo!... Aĥilo pravis, dirante, ke preferindas esti kamplaboristo en la subsuna mondo ol reĝo en Kimerujo<sup>165</sup>. Kaj ankaŭ tio estas demando — ĉu ekzistas iuj dioj, kvankam la nekredo pereigas la junan generacion.

Lukano estis dume disblovinta la tutan oran pudron

<sup>165</sup> Pli ĝuste, «...ol reĝo en la regno de l' mortintoj» (t.e. en Hadeso) — vd «Odiseado», 11:488-491.

de la haroj de Nigidia, kiu, ebriiĝinte, endormiĝis. Poste li deprenis hederajn branĉojn de vazo staranta antaŭ li, ĉirkaŭvolvis per ili la dormantinon, kaj, plenuminte tiun taskon, komencis rigardi la ĉeestantojn per okuloj kontentegaj kaj demandaj.

Post tio li ornamis sin mem per hedero, ripetante per tono de profunda konvinko:

— Mi tute ne estas homo, sed faŭno.

Petronio ne estis ebria, sed Nerono, kiu komence trinkis malmulte pro sia «ĉiela» voĉo, ĉe la fino malplenigadis pokalon post pokalo kaj ebriiĝis. Li volis kanti plu siajn versaĵojn, la grekajn ĉi-foje, sed li forgesis ilin kaj erare ekkantis kanteton de Anakreonto. Akompanis lin ĉe tio Pitagoro, Diodoro kaj Terpno, sed ĉar neniu el ili sukcesis, tial ili haltis. Nerono siavice komencis, kiel konanto kaj estetikulo, admiri la belecon de Pitagoro, kaj pro admiro kisi liajn manojn. Tiel belegajn manojn li vidis iam nur ... ĉe kiu?

Kaj metinte la manplaton al la malseka frunto, li komencis rememori. Post momento sur lia vizaĝo aperis timo:

— Ah ha! Ĉe la patrino! Ĉe Agripino!

Kaj subite ekposedis lin malserenaj vizioj.

— Oni diras, — li parolis, — ke ŝi vagas nokte ĉe lun-

lumo apud la maro, ĉirkaŭ Bajo kaj Baŭlo...<sup>166</sup> Ŝi nur vagas, kvazaŭ ŝi ion serĉus — nenio pli. Kaj kiam ŝi proksimiĝas al boato, ŝi rigardas iom kaj foriras, sed la fiŝkaptisto, kiun ŝi rigardis, mortas.

— Nermalbona temo, — diris Petronio.

Kaj Vesteno, etendinte la kolon, kiel gruo, flustris mistere:

— Mi ne kredas je la dioj, sed mi kredas je la spiritoj ... ho!

Sed Nerono ne atentis iliajn vortojn kaj parolis plu:

— Mi plenumis ja la *lemuriojn*<sup>167</sup>. Mi ne volas ŝin vidi! Jam estas la kvina jaro. Mi devis, mi devis ŝin kondamni, ĉar ŝi sendis kontraŭ mi mortigiston, kaj se mi ne estus antaŭaginta, vi ne aŭdus hodiaŭ mian kanton.

— Dankon, Cezaro, en la nomo de la Urbo kaj de la mondo, — ekkriis Domicio Afro.

— Vinon! Kaj oni sonigu timpanojn!

La bruo rekomenciĝis. Lukano, tuta en hedero, volante ĝin superkrii, leviĝis kaj komencis hurli:

— Mi ne estas homo, sed faŭno, kaj mi loĝas en arbaro! E...ĥo...oooo!

<sup>166</sup> Latine *Bajæ* kaj *Baŭli* — La murdo de Agripino okazis dum ŝia reveno el Bajo; kaj apude (ĉe la Averno lago) latinaj poetoj lokis enirejon en Hadeson kaj la mitan «urbon de kimeroj» *Cimmerium*.

<sup>167</sup> Latine *lemur(al)ia* (lat.) — oferoj por animoj de mortintoj.

Fine ebriiĝis Nerono, ebriiĝis la viroj kaj la virinoj. Vinicio estis ne malpli ebria ol la aliaj, kaj krom tio ekster la pasio naskiĝis en li inklino al malpaco, kio okazadis ĉiufoje, kiam li drinkis supermezure. Lia nigreta vizaĝo iĝadis ankoraŭ pli pala kaj liaj vortoj jam konfuziĝis, kiam li parolis rapide per laŭta kaj ordona voĉo:

— Donu la buŝon! Hodiaŭ, ĉu morgaŭ, estas egale! Sufiĉe jam! La imperiestro prenis cin de Aŭlo por cin donaci al mi, ci komprenas! Morgaŭ je la krepusko mi sendos sklavojn por cin preni, ci komprenas! La imperiestro promesis cin al mi, antaŭ ol li cin prenis ... Ci devas esti mia! Donu la buŝon! Mi ne volas atendi ĝis morgaŭ ... donu rapide la buŝon!

Kaj li ĉirkaŭprenis ŝin, sed Akteo komencis ŝin defendi, kaj ankaŭ Ligia mem sin defendis per la lastaj fortoj, ĉar ŝi sentis, ke ŝi pereas. Vane tamen ŝi penis ambaŭmane depreni de si lian senharan brakon; vane per voĉo, en kiu vibris korporemo kaj timo, ŝi petegis, ke li ne estu tia, kia li estas, ke li ŝin kompatu. Lia vinsaturita spiro ĉirkaŭblovadis ŝin ĉiam pli proksime, kaj lia vizaĝo troviĝis tuj apud la ŝia. Li ne estis plu tiu iama, bona Vinicio, preskaŭ kara al ŝia animo, sed ebria, malbona satiruso, kiu plenigis ŝin per teruro kaj abomeno.

La fortoj tamen forlasadis ŝin ĉiam pli. Vane, forklininte sin, ŝi turnis for la vizaĝon por eviti liajn kisojn. Li leviĝis, kaptis ŝin per ambaŭ brakoj, kaj altirinte ŝian kapon al la brusto, komencis, spiregante, dispremi per la buŝo ŝian paliĝintan buŝon.

Sed en la sama momento terura forto disigis liajn brakojn for de ŝia kolo tiel facile, kvazaŭ tio estus brakoj infanaj, kaj lin mem ŝovis flanken, kiel sekan branĉeton aŭ velkintan folion. Kio okazis? Vinicio frotis la mirigitajn okulojn kaj subite ekvidis super si la grandegan figuron de la ligio nomata Urso, kiun li ekkonis en la domo de Aŭlo.

La ligio staris trankvile kaj nur rigardis Vinicion per siaj bluaj okuloj tiel strange, ke al la juna viro la sango koagulis en la vejnoj, poste li prenis sur la brakojn sian reĝidinon kaj per paŝo egalmezura, malbrua, eliris el la triklinio.

Akteo en la sama momento eliris post li.

Vinicio sidis dum sekundo, kiel ŝtoniĝinta, poste li saltleviĝis kaj ekkuris al la elirejo.

Sed la pasio, mirego, furiozo kaj vino subhakis liajn piedojn. Li ekŝanceliĝis foje kaj refoje, poste kaptis la nudan ŝultron de iu el la bakĥantinoj kaj komencis, palpebrumante, demandi:



— Kio okazis?

Kaj ŝi, preninte pokalon kun vino, transdonis ĝin al li kun rideto en la nebulkovritaj okuloj:

— Trinku, — ŝi diris.

Vinicio eltrinkis kaj falegis planken.

La plimulto de la gastoj kuŝis jam sub la tabloj; aliaj vagis per ŝanceliĝema paŝo tra la triklinio, aliaj dormis sur sofoj, ronkante aŭ vomante en la dormo superfluon de la vino, kaj sur la ebriajn konsulojn kaj senatanojn, sur la ebriajn kavalirojn, poetojn, filozofojn, sur la ebriajn dancistinojn kaj patriciinojn, sur tiun tutan mondon, ĉioregan ankoraŭ, sed jam senaniman, florkronitan kaj diboĉegan, sed jam estingiĝantan, el la ora retego, streĉita sub la plafono, pluvis kaj pluvis senĉese rozoj.

Ekstere komencis tagiĝi.

## Ĉapitro 8<sup>a</sup>

Urson neniŭ haltigis, neniŭ eĉ demandis, kion li faras. Tiuj el la gastoj, kiuj ne kuŝis sub la tablo, ne plu okupis siajn lokojn, do servistoj, vidante grandegulon porti sur la brakoj festenaninon, pensis, ke tio estas sklavo, elportanta sian ebrian sinjorinon. Cetere Akteo iris kun ili, kaj ŝia ĉeesto forigis ĉian dubon.

Tiamaniere ili eliris el la triklinio en apudan ĉambron, kaj el tie en galerion, kondukantan al la loĝejo de Akteo.

La fortoj forlasis Ligian tiagrade, ke ŝi pezis, kiel senviva, sur la brakoj de Urso. Sed kiam ĉirkaŭblovis ŝin malvarmeta kaj pura aero, ŝi malfermis la okulojn. Tagiĝadis ĉiam pli. Post momento, irante laŭlonge de la galerio, ili enpaŝis flankan portikon, turnitan ne al la korto, sed al la palacaj ĝardenoj, kie la pintoj de pinioj kaj cipresoj roznuancis jam de la matenruĝo. Tiu parto de la grandega konstruaĵo estis senhoma kaj la resonoj de la muziko, de la festena kriadado atingis ilin ĉiam malpli klare. Al Ligia ekŝajnis, ke oni elŝiris ŝin el infero kaj elportis en la lumanan mondon de Dio. Do, ekzistis io ekster tiu abomena triklinio. Ekzistis la ĉielo, la matenruĝo, la lumo kaj la kvieto. La knabinon kaptis subita ploro kaj, sin premante al la ŝultro de la grandegulo, ŝi komencis ripeti plorĝeme:

— Ni iru hejmen, Urso! hejmen, al Aŭlo!

— Ni iru, — respondis Urso.

Dume tamen ili troviĝis en la malgranda atrio, apartenanta al la loĝejo de Akteo. Tie Urso sidigis Ligian sur marmoran benkon, proksime de la fontano, kaj Akteo komencis ŝin trankviligi kaj instigi al dormo, certigante, ke ĉi-momente nenio ŝin minacas, ĉar la ebriaj festenanoj dormos post la festeno ĝis la vespero. Sed Ligia dum longa tempo ne volis trankviliĝi, kaj, premante la tempojn per la manoj, ripetadis, kiel infano:

— Hejmen! Al Aŭlo!

Urso estis preta. Certe, ĉe la pordego staras pretorianoj, sed li ja iel trairos. La soldatoj ne haltigas elirantojn. Antaŭ la arko svarmas portiloj. Homoj komencos eliri grandare. Neniu ilin haltigos. Ili eliros kune kun la amaso kaj iros rekte hejmen. Cetere, ne li decidus pri tio! Kiel la reĝidino ordonas, tiel estu. Por tio li ja estas ĉi tie.

Kaj Ligia ripetadis:

— Jes, Urso, ni eliros.

Akteo devis havi prudenton por ili ambaŭ. Ili eliros! Jes! Neniu ilin haltigos. Sed forkuri el la imperiestra palaco estas malpermesite, kaj kiu tion faras, ofendas lian majeston. Ili eliros, sed vespere centuriestro fronte de soldatoj alportos mortverdikon al Aŭlo, al Pomponia Grecina,

Ligian prenos ree en la palacon, kaj tiam restos por ŝi nenia savrimedo. Se la Plaŭcioj akceptos ŝin en sian hejmon, morto atendas ilin sendube.

La brakoj de Ligia falis. Estis nenia rimedo. Ŝi devis elekti inter la pereco de la Plaŭcioj kaj la sia. Irante al la festeno, ŝi esperis, ke Vinicio kaj Petronio elpetos ŝin de la imperiestro kaj redonos al Pomponia, nun ŝi tamen scias, ke ĝuste ili instigis la imperiestron forpreni ŝin de Aŭlo. Estis neniu rimedo. Nur miraklo povis savi ŝin el tiu abismo. Miraklo kaj la dia potenco.

— Akteo, — ŝi diris malespere, — ĉu ci aŭdis, kion diris Vinicio, ke la imperiestro min donacis al li kaj ke vespere li alsendos sklavojn kaj prenos min en sian domon?

— Mi aŭdis, — diris Akteo.

Kaj dismetinte la brakojn, ŝi eksilentis. La malespero, kun kiu Ligia parolis, ne trovis en ŝi eĥon. Ŝi mem estis ja amatino de Nerono. Ŝia koro, kvankam bona, ne povis sufiĉe senti la hontindecon de tia rilato. Kiel eksa sklavinino, ŝi tro alkutimiĝis al la leĝoj de sklaveco, kaj krom tio ŝi plu amis Neronon. Se li volus al ŝi reveni, ŝi etendus al li la brakojn, kiel al sia feliĉo. Vidante nun klare, ke Ligia devas aŭ iĝi amatino de la juna kaj bela Vinicio, aŭ elmeti sin mem kaj la Plaŭciojn al pereco, ŝi simple ne komprenis, kiel la knabino povis heziti.

— En la imperiestra palaco, — ŝi diris post momento, — ci ne estus pli sekura ol en la domo de Vinicio.

Kaj ne venis al ŝi la penso, ke kvankam ŝi diris la veron, ŝiaj vortoj signifis: «paciĝu kun la sorto kaj iĝu konkubino de Vinicio». Sed al Ligia, kiu sentis ankoraŭ sur la buŝo liajn kisojn, plenajn je besta pasio kaj brulantajn, kiel karbo, la sango ekfluis en la vizaĝon pro honto ĉe la nura rememoro pri ili.

— Neniam! — ŝi ekkriis eksplode. — Mi restos nek ĉi tie, nek ĉe Vinicio! Neniam!

Akteon mirigis ŝia eksplodo.

— Ĉu ci tiom malamas Vinicion? — ŝi demandis.

Sed Ligia ne povis respondi, ĉar denove kaptis ŝin ploro. Akteo alpremis ŝin al la brusto kaj komencis trankviligi.

Urso spiris peze kaj kunpremis la grandegajn pugnojn, ĉar, amante kun hunda fideleco sian reĝidinon, li ne povis elteni la vidon de ŝiaj larmoj. En lia ligia, duonsovaĝa koro naskiĝis la deziro reveni en la festenejon, sufoki Vinicion kaj, se necese, ankaŭ la imperiestron, li timis tamen proponi al sia sinjorino tian servon, ne estante certa, ĉu tia ago, kiu komence ŝajnis al li treege simpla, konvenas al konfesanto de la krucumita Ŝafido.

Kaj Akteo, kvietiginte Ligian, komencis denove de-

mandi:

— Ĉu ci tiel lin malamas?

— Ne, — diris Ligia, — mi ne rajtas lin malami, ĉar mi estas kristanino.

— Mi scias, Ligia. Mi ankaŭ scias el la leteroj de Paŭlo el Tarso, ke vi, kristanoj, ne rajtas malhonorigi, nek timi morton pli ol pekon, sed diru al mi, ĉu cia instruo permesos kaŭzi morton?

— Ne.

— Kiel do ci povas venigi venĝon de la imperiestro sur la domon de Aŭlo?

Sekvis momento da silento. Abismo sen fundo malfermiĝis denove antaŭ Ligia.

Kaj la juna liberigitino parolis plu:

— Mi demandas, ĉar mi bedaŭras cin, mi bedaŭras la bonan Pomponian, kaj Aŭlon, kaj ilian infanon. Mi longe vivas en ĉi tiu domo, kaj mi scias, per kio minacas la koleto de la imperiestro. Ne! Vi ne povas eskapi el ĉi tie. Nur unu rimedo restas al ci: petegi Vinicion, ke li redonu cin al Pomponia.

Sed Ligia malsuprenŝovis sin sur la genuojn por petegi iun alian. Ankaŭ Urso surgenuiĝis, kaj ambaŭ komencis preĝi en la imperiestra palaco, ĉe la matenruĝo.

Akteo la unuan fojon vidis tian preĝon kaj ne povis

deturni la okulojn de Ligia, kiu, turnite al ŝi profile, levinte la kapon kaj la manojn al la ĉielo, kvazaŭ atendis helpo de tie. La tagiĝo verŝis lumon sur ŝiajn malhelajn harojn kaj sur la blankan peplon, speguliĝis en la pupiloj, kaj, tuta en brilo, ŝi mem aspektis kiel lumo. En ŝia paliĝinta vizaĝo, en la malfermita buŝo, en la levitaj manoj kaj okuloj oni vidis ian superteran ekstazon. Kaj Akteo nun ekkomprenis, kial Ligia povis iĝi nenies konkubino. Antaŭ la iama amatino de Nerono flankeniĝis kvazaŭ rando de vualo, kovranta mondon tute alian ol tiu, al kiu ŝi kutimis. Mirigis ŝin tiu preĝo, tie ĉi, en la domo de krimo kaj senhonto. Antaŭ momento ŝajnis al ŝi, ke ekzistas por Ligia neniu savrimedo, sed nun ŝi komencis kredi, ke povas okazi io eksterordinara, ke venos ia helpo, tiel potenca, ke la imperiestro mem ne povos ĝin rezisti, ke el la ĉielo malsuprenvenos ia flugilhava armeo helpe al la knabino, aŭ ke la suno substernos al ŝi siajn radiojn kaj tiros al si. Ŝi aŭdis jam pri multaj mirakloj inter la kristanoj, kaj pensis nun, ke videble ĉio tio estas vero, se Ligia tiel preĝas.

Kaj Ligia leviĝis fine kun vizaĝo lumigita de espero; ankaŭ Urso leviĝis, kaj ekkaŭrinte apud la benko, li rigardis sian sinjorinon, atendante ŝiajn vortojn.

La okuloj de Ligia nebuliĝis kaj post momento du

grandaj larmoj ruliĝis malrapide sur ŝiaj vangoj.

— Dio benu Pomponian kaj Aŭlon, — ŝi diris. — Mi ne rajtas ilin pereigi, do mi neniam revidos ilin.

Poste, sin turninte al Urso, ŝi komencis paroli al li, ke li sola restis al ŝi en la mondo, ke li devas nun esti ŝia patro kaj zorganto. Ili ne povas serĉi rifuĝon ĉe Aŭlo, ĉar tio venigus sur ilin koleron de Nerono. Sed ŝi ankaŭ ne povas resti en la imperiestra palaco, nek ĉe Vinicio. Urso do prenu ŝin, konduku el la urbo kaj kaŝu ie, kie ŝin trovos nek Vinicio, nek liaj servistoj. Ŝi iros kun li ĉien, eĉ trans marojn, eĉ trans montojn, al barbaroj, kie oni ne aŭdis la nomon de Romo kaj kien ne atingas la povo de la imperiestro. Li prenu ŝin kaj savu, ĉar li sola restis al ŝi.

La ligio estis preta kaj, signe de obeo, kliniĝinte, li ĉirkaŭprenis ŝiajn piedojn. Sed sur la vizaĝo de Akteo, kiu atendis miraklon, bildiĝis elreviĝo. Nur tion kaŭzis do tiu preĝo? Forkuri el la imperiestra palaco signifas plenumi krimon de ofendo de lia majesto, kiu devas esti venĝita, kaj eĉ se Ligia sukcesus kaŝi sin, Nerono venĝos kontraŭ la Plaŭcioj. Se ŝi volas eskapi, ŝi eskapu el la domo de Vinicio. Tiam la imperiestro, kiu nevolonte okupiĝas pri fremdaj aferoj, eble eĉ ne volos helpi al Vinicio en la serĉado, kaj ĉiuokaze ne estos plenumita krimo de ofendo de la majesto.



Sed Ligia mem ĝuste tiel pensis. La Plaŭcioj eĉ ne sci-  
os, kie ŝi estas, eĉ ne Pomponia. Tamen ŝi eskapos ne el la  
domo de Vinicio, sed elvoje. Li diris al ŝi en sia ebrieco, ke  
vespere li sendos por ŝi siajn sklavojn. Li diris sendube la  
veron, kiun li ne konfesus, se li estus sobra. Supozeble li  
mem, aŭ eble li kune kun Petronio, parolis antaŭ la feste-  
no kun Nerono kaj ricevis de li la promeson, ke morgaŭ  
vespere li ŝin transdonos. Kaj se hodiaŭ ili eĉ forgesus, ili  
sendos por ŝi morgaŭ. Sed Urso savos ŝin. Li venos, elpor-  
tos ŝin el la portilo, kiel li ŝin elportis el la triklinio, kaj ili  
iros en la mondon. Al Urso neniu kapablos rezisti. Al li ne  
rezistus eĉ tiu terura luktisto, kiu hieraŭ luktis en la trikli-  
nio. Sed ĉar Vinicio povas sendi tre multe da sklavoj, tial  
Urso iros tuj al la episkopo, Lino<sup>168</sup>, por peti konsilon kaj  
helpon. La episkopo kompatos ŝin, ne lasos en la manoj  
de Vinicio, kaj ordonos al kristanoj iri kun Urso kaj savi  
ŝin. Ili ŝin elbatalos kaj forkondukos, kaj poste Urso scios  
elirigi ŝin el la urbo kaj kaŝi ie de la romia potenco.

Kaj ŝia vizaĝo denove komencis kovri sin per rozkolo-  
ro kaj ridi. Kuraĝo denove ŝin plenigis, kvazaŭ la espero  
pri savo estus jam iĝinta realaĵo. Subite ŝi ĵetis la brakojn  
ĉirkaŭ la kolon de Akteo kaj, almetinte sian belegan buŝ-

<sup>168</sup> Latine *Linus* (m. 76 p.K.) — la unua papo de Romo (aŭ la dua, laŭ la pli malfrua tradicio kalkuli de Petro). La nomformo *Lino* aperas en la Londona Biblio (2Tim 4:21).

on al ŝia vango, komencis flustri:

— Ci ne perfidos nin, Akteo, ĉu ne?

— Je la ombro de mia patrino, — respondis la liberiginto, — mi ne perfidos vin, kaj petu nur cian Dion, ke Urso sukcesu cin elbatali.

Sed la bluaj, infanaj okuloj de la grandegulo brilis de feliĉo. Jen, li sciis nenion elpensi, kvankam li streĉis sian mizeran kapon, sed tian aferon li ja scipovos. Kaj ĉu tage, aŭ nokte, estas al li egale!... Li iros al la episkopo, ĉar la episkopo legas en la ĉielo, kion oni devas fari, kaj kion oni ne devas. Sed kolekti kristanojn li sciis ĉiuokaze. Ĉu li ne havas sufiĉe da konatoj, sklavoĵoj, gladiatoroj kaj liberaj homoj, kaj en Suburo, kaj trans la pontoj? Li kolektus milon, kaj du milojn da ili. Li elbatalos sian sinjorinon, kaj elkonduki ŝin el la urbo li ankaŭ scipovos, kaj iri kun ŝi li scipovos. Ili iros eĉ al la fino de la mondo, eĉ tien, el kie ili venis, kaj kie neniu aŭdis pri Romo.

Tiam li komencis rigardi antaŭ sin, kvazaŭ volante vidadingi iajn aferojn pasintajn kaj treege malproksimajn, poste li komencis paroli:

— En nian arbaregon? Ho, kia arbarego, kia arbarego estas tie!

Sed post momento li forskuis de si la viziojn:

Jen, li tuj iros al la episkopo, kaj vespere kun ia cento

da homoj li jam embuskos la portilon. Kaj konduku ĝin tiam ne nur sklavoj, sed eĉ pretorianoj!! Neniu jam preferu ŝovu sin sub lian pugnon, eĉ en fera kiraso ... Ĉar ĉu fero estas tiel forta? Se oni dece frapos kaskon, la kapo sub ĝi ne eltenos la frapon!

Sed Ligia kun grandega kaj kune infana seriozeco levigis supren la fingron.

— Urso! «Ne mortigu!», — ŝi diris.

La ligio ŝovis sian madzosimilan brakegon malantaŭ la kapon kaj komencis, murmurante, froti la nukon kun granda embaraso: li ja devas elbatali ŝin ... «sian lumon» ... Ŝi mem diris, ke nun estas lia vico ... Li atentis, kiom li povos. Sed se tio okazus senvole? Li ja devas ŝin elbatali! Nu, se ĝi okazos, li tiel pentofaros, tiel petos pardonon de la Senkulpa Ŝafido, ke la Krucumita Ŝafido indulgos lin, mizeran ... Li ja ne volus ofendi la Ŝafidon, nur la manojn li havas tiel pezajn ... Granda kortuŝo bildiĝis sur lia vizaĝo, sed volante ĝin kaŝi, li riverencis kaj diris:

— Do mi iras al la sankta episkopo.

Kaj Akteo, ĉirkaŭpreninte la kolon de Ligia, komencis plori...

Ankoraŭfoje ŝi ekkomprenis, ke ekzistas mondo, kie eĉ en sufero estas pli da feliĉo ol en ĉiuj luksoj kaj ĝuoj de la imperiestra palaco, ankoraŭfoje fende malfermiĝis an-

taŭ ŝi pordo al lumo, sed samtempe ŝi eksentis, ke ŝi ne indas trairi tiun pordon.

## Ĉapitro 9<sup>a</sup>

La koro de Ligia premiĝis pro sopiro je Pomponia Grecina, kiun ŝi amis per la tuta animo, kaj je la tuta domo de Aŭlo, tamen ŝia malespero pasis. Ŝi sentis eĉ certan dolĉecon, pensante, ke jen ŝi oferas por sia Vero la bonstaton kaj komforton kaj akceptas vagan, nekonatan vivon. Eble estis en tio iom da infana scivolo, kia estos tiu vivo, for, en malproksimaj landoj, inter barbaroj kaj sovaĝaj bestoj, estis tamen pli multe da profunda kaj fidanta kredo, ke ŝi agas tiel, kiel ordonis la dia Majstro, kaj ke de nun li mem zorgos pri ŝi, kiel pri obea kaj fidela infano. Kaj en tiu okazo kia malbono povas ŝin trafi? Se venos iaj suferoj, ŝi elportos ilin en lia nomo. Se venos neatendita morto, li prenos ŝin, kaj iam, kiam mortos Pomponia, ili estos kune dum la tuta eterneco. Multfoje, ankoraŭ en la domo de Aŭlo, ŝi afliktis sian infanan kapeton, ke ŝi, kristanino, povas nenion fari por tiu Krucumito, pri kiu Urso parolis kun tia kortuŝo. Sed nun la momento venis!

Ligia sentis sin preskaŭ feliĉa kaj komencis rakonti pri sia feliĉo al Akteo, kiu tamen ne povis ŝin ekkompreni. Forlasi ĉion, forlasi la domon, bonstaton, la Urbon,

ĝardenojn, templojn, portikojn, ĉion, kio estas bela, forlasi la sunan landon kaj la proksimajn homojn, kaj kial? Por kaŝi sin de amo de juna kaj bela kavaliro?... Ĉio tio ne povis eniri en la kapon de Akteo. En momentoj ŝi sentis, ke tio estas prava, ke povas eĉ esti en tio ia grandega, mistera feliĉo, sed ŝi ne povis klare konsciigi tion al si, tiom pli, ke antaŭ Ligia estis ankoraŭ travivaĵo, kiu povis malbone finiĝi, kaj en kiu ŝi povis simple perdi la vivon.

Akteo estis denature timema kaj kun maltrankvilo ŝi pensis pri tio, kion la vespero povas alporti. Sed ŝi ne volis paroli al Ligia pri sia timo, kaj ĉar intertempe plenlume tagiĝis kaj la suno enrigardis en la atrion, ŝi komencis inkliniĝi ŝin al ripozo, necesa post la sendorme pasigita nokto. Ligia ne kontraŭstaris, kaj ili ambaŭ eniris en la dormoĉambron, kiu estis vasta kaj lukse aranĝita, pro la iamaj rilatoj inter Akteo kaj Nerono. Tie ili kuŝiĝis unu apud la alia, sed Akteo, malgraŭ la laceco, ne povis endormiĝi. Delonge ŝi estis malgaja kaj malfeliĉa, sed nun komencis ŝin kapti ia maltrankvilo, kiun ŝi neniam spertis antaŭe. Ĝis tiam la vivo nur ŝajnis al ŝi peza kaj senmorgaŭa, nun ĝi ekŝajnis al ŝi subite malnobla.

En ŝia kapo naskiĝadis ĉiam pli granda ĥaoso. La por-do al la lumo komencis denove jen fermi sin, jen sin malfermi. Sed en la momentoj, kiam ĝi sin malfermis, la lumo

blindigis ŝin tiel, ke ŝi nenion vidis klare. Ŝi nur divenis pli ĝuste, ke tiu lumeco entenas ian feliĉon simple senliman, kompare kun kiu ĉio alia estas tiagrade senvalora, ke se, ekzemple, Nerono forigus Popean kaj ree ekamus ŝin, Akteon, eĉ tio estus vantaĵo. Subite venis al ŝi la ideo, ke tiu imperiestro, kiun ŝi amis kaj kiun malgraŭvole ŝi konsideris ia duondio, estas iu tiel mizera, kiel ĉiu el la sklavoj, kaj tiu palaco kun kolonaroj el numida marmoro estas io ne pli valora ol amaso da ŝtonoj. Sed fine tiuj sentoj, kiujn ŝi ne povis al si konsciigi, komencis ŝin turmenti. Ŝi penis endormiĝi, sed, mordate de maltrankvilo, ne povis.

Fine, supozante ke same maldormas ankaŭ Ligia, super kiu ekpendis tiom da danĝeroj kaj necerteco, Akteo sin turnis al ŝi por paroli pri ŝia vespera eskapo.

Sed Ligia dormis trankvile. En la malluman dormoĉambron, tra nesufiĉe precize surtirita kurteno, enfalis kelkaj helaj radioj, en kiuj flugturniĝis ora polvo. Ĉe ilia lumo Akteo rimarkis ŝian delikatan vizaĝon, apogitan sur la nuda brako, la fermitajn okulojn kaj iom malfermitan buŝon. Ŝi spiris egalritme, sed tiel, kiel oni spiras en dormo.

«Ŝi dormas, ŝi povas dormi!» — ekpensis Akteo, — «ŝi ja estas ankoraŭ infano.»

Tamen post momento venis en ŝian kapon la penso,

ke tiu infano preferas tamen forkuri ol iĝi amatino de Vinicio, ke ŝi preferas mizeron ol malhonoron, vagan vivon ol luksan domon ĉe Karinoj ol belajn vestojn, juvelojn kaj festenojn, sonojn de liutoj kaj citroj.

«Kial?»

Kaj ŝi komencis rigardi Ligian, kvazaŭ volante trovi respondon en ŝia dormlulata vizaĝo. Ŝi rigardis ŝian puran frunton, la serenajn arkojn de la brovoj, la duone malfermitan buŝon, la knabinan bruston movatan de trankvila spiro, post tio ŝi ekpensis denove:

«Kiel diferenca ŝi estas de mi!»

Kaj Ligia ekŝajnis al ŝi io mirinda, ia dia vizio, iu amelektita de dioj, centoble pli bela ol ĉiuj floroj en la imperiestra ĝardeno kaj ol ĉiuj skulptaĵoj en lia palaco. Sed en la koro de la grekino ne estis envio. Kontraŭe, je la penso pri la danĝeroj, kiuj minacis la knabinon, kaptis ŝin granda kompatato. Naskiĝis en ŝi ia patrina sento; Ligia ekŝajnis al ŝi ne nur belega, sed ankaŭ tre amata, kaj proksimiginte la buŝon al ŝiaj malhelaj haroj, ŝi komencis ilin kisi.

Ligia dume dormis trankvile, kvazaŭ hejme, sub la zorgado de Pomponia Grecina. Kaj ŝi dormis sufiĉe longe. La tagmezo jam pasis, kiam ŝi malfermis siajn bluajn okulojn kaj komencis ĉirkaŭrigardi tra la dormoĉambro kun

grandega miro. Mirigis ŝin videble, ke ŝi ne estas hejme, ĉe Aŭlo.

— Ĉu tio estas ci, Akteo? — ŝi diris fine, rimarkinte en la krepusko la vizaĝon de la grekino.

— Mi, Ligia.

— Ĉu jam estas vespero?

— Ne, infano, sed la tagmezo jam pasis.

— Kaj Urso ne revenis?

— Urso ne diris, ke li revenos, nur ke vespere li embuskos kun kristanoj la portilon.

— Vere.

Post tio ili forlasis la dormoĉambron kaj iris en banejon, kie, baninte Ligian, Akteo kondukis ŝin al matenmanĝo, kaj poste en la palacajn ĝardenojn, kie oni devis timenian danĝeran renkonton, ĉar Nerono kaj liaj plej eminentaj korteganoj dormis ankoraŭ. Ligia la unuan fojon en la vivo vidis tiujn grandiozajn ĝardenojn, plenajn je cipresoj, pinioj, kverkoj, olivarboj kaj mirtoj, inter kiuj blankis tuta popolo da statuoj, brilis trankvilaj speguloj de lagetoj, floris tutaj boskoj da rozoj, surŝpucataj de fontana akvopolvo, kie eniron al sorĉaj grotoj ĉirkaŭkreskis hedero aŭ vinberbranĉoj, kie sur la akvoj naĝis arĝentaj cignoj, kaj inter la statuoj kaj arboj promenis malsovaĝigitaj gazeloj el dezertoj de Afriko kaj diverskoloraj birdoj,



venigitaj el ĉiuj konataj landoj de la mondo.

La ĝardenoj estis senhomaj; tie kaj ie kun fosiloj en la manoj laboris sklavo, duonvoĉe kantante; aliaj, al kiuj oni donis momenton da ripozo, sidis apud lagetoj aŭ en ombro de kverkoj, en tremantaj lumetoj, penetrantaj tra la folioj; aliaj fine surŝprucadis rozojn aŭ palviolajn safranflorojn. Akteo kaj Ligia promenis sufiĉe longe, rigardante ĉiujn mirindaĵojn de la ĝardenoj, kaj kvankam mankis al Ligia la libereco de la penso, ŝi estis ankoraŭ tro infana por povi kontraŭstari la intereson, scivolon kaj admiron. Venis eĉ en ŝian kapon la ideo, ke se la imperiestro estus bona, tiam en tia palaco kaj en tiaj ĝardenoj li povus esti tre feliĉa.

Sed fine, iom lacaj, ili sidiĝis sur benko, preskaŭ tute kaŝita en cipresa densaĵo, kaj komencis paroli pri tio, kio plej multe pezis sur iliaj koroj, tio estas pri la vespera eskapo de Ligia.

Akteo estis multe malpli trankvila ol Ligia pri la sukceso de tiu eskapo. En momentoj eĉ ŝajnis al ŝi, ke tio estas freneza plano, kiu ne povas sukcesi. Ŝi sentis ĉiam pli grandan kompaton por Ligia. En ŝian kapon venis la ideo, ke centoble malpli danĝere estus peni persvadi Vinicion. Post momento ŝi komencis demandi Ligian, kiel longe ŝi konas Vinicion, kaj ĉu ŝi opinias, ke li eble lasus sin mo-

ligi kaj redonus ŝin al Pomponia.

Sed Ligia skuis malgaje sian malhelan kapeton.

— Ne. En la domo de Aŭlo Vinicio estis alia, tre bona, sed de la hieraŭa festeno mi lin timas kaj preferas forkuri al la ligioj.

Akteo demandis plu:

— Tamen en la domo de Aŭlo li estis al ci simpatia?

— Jes, — respondis Ligia, klinante la kapon.

— Ci ja ne estas sklavino, kia mi estis, — diris Akteo post momenta pripenso. — Vinicio povus al ci edziĝi. Ci estas garantiulino kaj filino de la reĝo de la ligioj. Aŭlo amas cin, kiel propran infanon, kaj mi estas certa, ke ili prete akceptus cin kiel filinon. Vinicio povus al ci edziĝi.

Sed ŝi respondis ankoraŭ pli mallaŭte kaj malgaje:

— Mi preferas forkuri al la ligioj.

— Ligia, ĉu ci volas, ke mi tuj iru al Vinicio, veku lin, se li dormas, kaj diru tion, kion mi diras nun al ci? Jes, mia kara, mi iros al li kaj diros: Vinicio, ŝi estas reĝa filino kaj amata infano de la glora Aŭlo; se ci amas ŝin, redonu ŝin al Aŭlo kaj poste prenu ŝin, kiel edzinon, el ilia domo.

La knabino tamen respondis per voĉo jam tiel mallaŭta, ke Akteo apenaŭ povis aŭdi:

— Mi preferas al la ligioj.

Kaj du grandaj larmoj ekpendis sur ŝiaj mallevitaj

okulharoj.

Sed la pluan interparolon interrompis brueto de proksimiĝantaj paŝoj, kaj antaŭ ol Akteo havis tempon vidi, kiu venas, antaŭ la benko aperis Sabena Popea kun malgranda sklavina sekvantaro. Du sklavinoj tenis super ŝia kapo tufojn da strutaj plumoj, fiksitajn sur oraj stangoj, per kiuj ili ventumis ŝin facile kaj ŝirmis kontraŭ la ankorau brulanta aŭtuna suno, dum antaŭ ŝi etiopino, nigra, kiel ebono, kun pufaj mamoj, kvazaŭ ŝvelintaj de lakto, portis sur la brakoj infanon, ĉirkaŭvolvitan per purpura tuko kun oraj franĝoj. Akteo kaj Ligia leviĝis, supozante, ke Popea pasos preter la benko sen atenti ilin, sed ŝi haltis antaŭ ili kaj diris:

— Akteo, la sonoriletoj, kiujn ci alkudris al la pupo, estis malbone alkudritaj; la infano deŝiris unu kaj ekportis al la buŝo; feliĉe, Lilito rimarkis tion sufiĉe frue.

— Pardonu, dia, — respondis Akteo, krucigante la manojn sur la brusto kaj klinante la kapon.

Sed Popea komencis rigardi Ligian.

— Kiu estas ĉi tiu sklavino, — ŝi demandis post momento.

— Ŝi ne estas sklavino, dia aŭgustino, sed zorgatino de Pomponia Grecina kaj filino de la reĝo de la ligioj, donita de li al Romo, kiel garantiulino.

- Kaj ŝi venis cin viziti?
- Ne, aŭgustino. De antaŭhieraaŭ ŝi loĝas en la palaco.
- Pro kies ordono?
- Pro la ordono de la imperiestro...

Popea komencis ankoraŭ pli atente rigardi Ligian, kiu staris antaŭ ŝi kun klinita kapo, jen levante pro sciemo siajn radiajn okulojn, jen denove kovrante ilin per la palpebroj. Subita sulko aperis inter la brovoj de la aŭgustino. Ĵaluza pri sia beleco kaj pri la regado, ŝi vivis en senĉesa timo, ke iam iu feliĉa rivalino pereigos ŝin, kiel ŝi pereigis Oktavian. Tial ĉiu bela vizaĝo en la palaco vekis en ŝi suspekton. Per okulo de spertulino ŝi ekzamenis unurigarde la tutan figuron de Ligia, taksis ĉiun detalon de ŝia vizaĝo, kaj ektimis. «Ŝi estas simple nimfo», — ŝi diris al si. «Ŝin naskis Venero mem». Kaj subite venis en ŝian kapon la penso, kiu ĝis nun venis al ŝi neniam, ĉe ekvido de iu ajn belulino: ke ŝi estas multe pli aĝa! Ekvibris en ŝi la vundita memamo, kaptis ŝin maltrankvilo kaj diversaj timoj rapide trairis ŝian kapon. «Eble Nerono ŝin ne vidis, aŭ eble, rigardante tra la smeraldo, li ne ĝuste taksis ŝin. Sed kio povas okazi, se li renkontos ŝin tage, ĉe sunlumo, tiel bel-eĝan?... Plie, ŝi ne estas sklavino, ŝi estas reĝa filino, el barbara gento, vere, sed reĝa filino! Dioj senmortaj! Ŝi estas same bela, kiel mi, kaj pli juna!» La sulko inter ŝiaj

brovoj iĝis ankoraŭ pli granda, kaj la pupiloj el sub la oraj okulharoj ekbrilis per malvarma brilo.

Sed, turninte sin al Ligia, ŝi komencis demandi kun ŝajna trankvileco:

— Ĉu ci parolis kun la imperiestro?

— Ne, aŭgustino.

— Kial ci preferas esti ĉi tie ol ĉe Aŭlo?

— Mi ne preferas, sinjorino. Petronio instigis la imperiestron, ke li forprenu min de Pomponia, sed mi estas ĉi tie kontraŭvole, sinjorino!

— Kaj ci dezirus reveni al Pomponia?

La lastan demandon Popea faris per voĉo pli mola kaj pli milda, do en la koron de Ligia penetris espero.

— Sinjorino, — ŝi diris, etendante al ŝi la manojn, — la imperiestro promesis fordoni min, kiel sklavinon, al Vinicio, sed ci propetu pri mi kaj revenigu min al Pomponia.

— Do Petronio instigis la imperiestron, ke li forprenu min de Aŭlo kaj fordonu al Vinicio?

— Jes, sinjorino. Vinicio estas sendonta por mi ankoraŭ hodiaŭ siajn sklavojn, sed ci, bona, ci kompatu min.

Dirinte tion, ŝi klinis sin, kaj kaptinte la randon de la vesto de Popea, atendis ŝian vorton kun batanta koro. Popea rigardis ŝin momente kun vizaĝo lumigita de malbona rideto, post kio ŝi diris:

— Do mi promesas al ci, ke jam hodiaŭ ci iĝos sklavinino de Vinicio.

Kaj ŝi foriris, kiel fantomo belega, sed malbona. La orelojn de Ligia kaj Akteo atingis nur krio de la infano, kiu ial komencis plori.

Ankaŭ la okuloj de Ligia pleniĝis je larmoj, sed post momento ŝi prenis la manon de Akteo kaj diris:

— Ni revenu. Helpon ni atendu nur el tie, el kie ĝi povas veni.

Kaj ili revenis en la atrion, kiun ili ne forlasis ĝis la vespero. Kiam mallumiĝis kaj kiam sklavoj enportis kvaroblajn meĉlampojn kun grandegaj flamoj, ili ambaŭ estis tre palaj. Ilia interparolo ŝiris sin ĉiumomente. Ambaŭ aŭskultis, ĉu iu ne proksimiĝas. Ligia ripetadis senĉese, ke kvankam kun bedaŭro ŝi forlasas Akteon, tamen, ĉar Urso jam atendas sendube en mallumo, ŝi preferus ke ĉio okazu hodiaŭ. Tamen pro emocio ŝia spiro iĝis pli rapida kaj pli laŭta. Akteo febre kolektis juvelojn, kiujn ŝi povis, kaj ligante ilin en la randon de la peplo, petegis Ligian, ke ŝi ne malakceptu tiun donacon kaj rimedon de eskapo. En momentoj ekregadis profunda silento, plena je aŭdotrompoj. Al ambaŭ ŝajnis, ke ili aŭdas jen ian flustron trans la kurteno, jen malproksiman ploron de infano, jen bojadon de hundoj.

Subite la kurteno de la vestiblo moviĝis sen bruo, kaj alta, malhela homo kun vizaĝo markita de variolo, aperis, kiel spirito, en la atrio. Ligia en unu momento rekonis Atacenon, liberigiton de Vinicio, kiu venadis en la domon de Aŭlo. Akteo ekkriis, sed Ataceno riverencis profunde kaj diris:

— Saluton al la dia Ligia de Marko Vinicio, kiu atendas ŝin kun festeno en la domo, ornamita per verdaĵo.

La lipoj de la knabino iĝis tute blankaj.

— Mi iras, — ŝi diris.

Kaj ŝi ĵetis adiaŭe la brakojn ĉirkaŭ la kolon de Akteo.

## Ĉapitro 10<sup>a</sup>

La domo de Vinicio efektive estis ornamita per mirta verdaĵo kaj hederoj, el kiuj oni faris plektaĵojn sur la muroj kaj super la pordoj. Kolonojn oni ĉirkaŭigis per volviĝantaj vinberbranĉoj. En la atrio, super kies malfermaĵo oni surtiris lanan purpuran kurtenon ŝirme kontraŭ la nokta malvarmo, estis lume, kiel en tago. Brulis okoblaj kaj dekduflamaj meĉlampoj, havantaj la formojn de vazoj, arboj, bestoj, birdoj aŭ statuoj, tenantaj lampojn, plenigitajn per bonodora olivoleo, skulptitaj el alabastro, el marmoro, el orumita korinta kupro, ne tiel mirindaj, kiel la fama kandelingo el la templo de Apolono, uzata de Nero-

no, sed belegaj kaj skulptitaj de famaj majstroj. Kelkaj el la meĉlampoj estis ŝirmitaj per aleksandriaj vitraĵoj aŭ difanaj teksaĵoj el apud Induso, ruĝaj, bluaj, flavaj, violaj, tiel ke la tuta atrio estis plena je diverskoloraj radioj. Ĉie sentiĝadis laodoro de nardo, al kiu Vinicio al kutimiĝis kaj kiun li ekŝatis en la oriento. La fundo de la domo, kie svarmis virinaj kaj viraj figuroj de sklavoj, egale plenis je lumo. En la triklinio tablo estis preta por kvar personoj, ĉar la festenon, krom Vinicio kaj Ligia, estis partoprenontaj Petronio kaj Ĥrizotemiso.

Vinicio sekvis en ĉio la vortojn de Petronio, kiu konsilis al li ne iri por venigi Ligian, sed sendi Ataceno kun la permeso, ricevita de la imperiestro, kaj mem akcepti ŝin hejme, kaj akcepti afable, eĉ kun signoj de respekto.

— Hieraŭ ci estis ebria, — li diris. — Mi vidis cin: ci kondukis al ŝi kiel ŝtonministro el la Albana montaro. Ne estu tro insista kaj memoru, ke bonan vinon oni devas trinki malrapide. Sciu ankaŭ, ke dolĉe estas deziri, sed ankoraŭ pli dolĉe — esti dezirata.

Ĥrizotemiso havis pri tio propran, iom alian opinion, sed Petronio, nomante ŝin sia vestalo kaj sia kolombineto, komencis klarigi al ŝi la diferencon, kiu estas inter lerta cirka ĉaristo kaj knabo, kiu unuafoje suriras kvadrigon. Poste, turninte sin al Vinicio, li parolis plu:



— Akiru ŝian fidon, gajigu ŝin, estu grandanima por ŝi. Mi ne volus vidi malgajan festenon. Ĵuru eĉ al ŝi je Hadeso, ke ci revenigos ŝin al Pomponia, kaj tio estos jam cia afero, ke ŝi preferu morgaŭ resti ol reveni.

Poste, montrante al Ĥrizotemiso, li aldonis:

— Mi de kvin jaroj ĉiutage kondukas pli malpli tiel same al ĉi tiu mia timema turtino, kaj mi ne povas plendi pro ŝia severeco...

Ĥrizotemiso responde frapis lin per ventumilo el pavaj plumoj kaj diris:

— Ĉu mi ne rezistis al ci, satiruso!

— Pro mia antaŭinto ...

— Ĉu ci ne estis ĉe miaj piedoj?

— Por meti ringojn sur iliajn fingrojn.

Ĥrizotemiso rigardis pretervole siajn piedojn, sur kies fingroj efektive fajris briloj de juveloj, kaj ambaŭ ili ekridis. Sed Vinicio ne aŭskultis iliajn kontraŭparolojn. Lia koro batis maltrankvile sub la desegnoriĉa vesto de siria pastro, per kiu li ornamis sin por akcepti Ligian.

— Ili devus jam eliri el la palaco, — li diris, kvazaŭ parolante al si mem.

— Ili devus, — respondis Petronio. — Eble mi dume rakontu al ci pri la aŭguroj de Apolonio el Tiano, aŭ la historion pri Rufeno, kiun mi ne finis, mi ne memoras kial.

Sed Vinicion malmulte interesis Apolonio el Tiano, same kiel la historio pri Rufeno. Lia penso estis ĉe Ligia; kaj kvankam li sentis, ke pli bele estis akcepti ŝin hejme ol iri kiel virinkaptisto en la palacon, li tamen fojfoje bedaŭris, ke li ne iris, nur tial, ke li povus pli frue vidi Ligan kaj sidi apud ŝi en mallumo en dupersona portilo.

Dume sklavoj enportis tripiedon, ornamitan per kapoj de virŝafoj, bronzajn pladojn kun karbo, sur kiun ili komencis ŝuti etajn tranĉaĵojn da mirho kaj nardo.

— Ili jam turniĝas al Karinoj — diris denove Vinicio.

— Li ne eltenos, elkuros renkonte kaj certe maltrafos ilin, — ekkriis Ĥrizotemiso.

Vinicio ridetis senpense kaj diris:

— Ne, mi eltenos.

Sed li komencis movi la nazflankojn kaj spiregi, kion vidante, Petronio levis la ŝultrojn.

— Neniom da filozofio estas en li, eĉ ne por sesterco, — li diris, — kaj neniam mi faros el tiu filo de Marso homon.

Vinicio eĉ ne ekaŭdis:

— Ili estas jam ĉe Karinoj!

Kaj ili efektive estis turniĝantaj al Karinoj. Sklavoj, nomataj *torĉistoj*,<sup>169</sup> iris fronte; aliaj, la kuristoj, ĉe ambaŭ

flankoj de la portilo; kaj Ataceno tuj post ĝi, estrante la irantaron.

Sed ili antaŭeniris tre malrapide — urba prilumado ne ekzistis, kaj la lanternoj nesufiĉe heligadis la vojon. Krome, la stratoj proksime de la palaco estis senhomaj — apenaŭ tie kaj ie preterpasis iu kun lanterno — sed, kontraŭe, pli malproksime ili estis neordinare movoplenaj. Preskaŭ el ĉiu flanka strateto eliradis homoj, triope, kvarope, ĉiuj sen lanternoj, ĉiuj en malhelaj manteloj. Kelkaj marŝis kune kun la irantaro, sin miksante kun la sklavo; aliaj, en pli grandaj aroj, venadis de kontraŭe. Kelkaj ŝancelis sin, kiel ebriaj. En momentoj la irado iĝadis tiel malfacila, ke la torĉistoj komencis krii:

— Lokon por la nobla tribunuso Marko Vinicio!

Ligia vidis tra disŝovitaj kurtenoj tiujn malhelajn arojn kaj komencis tremi pro emocio. Kaptadis ŝin alterne jen espero, jen timo. «Estas li! Urso kaj la kristanoj! Tio okazos tuj», — ŝi diris per tremantaj lipoj. — «Ho Kristo, ho Kristo, savu!» Eĉ Ataceno, kiu komence ne atentis tiun neordinaran stratmovadon, komencis fine maltrankvili. Estis en tio io stranga. La torĉistoj devis ĉiam pli ofte voĉi: «Lokon por la portilo de la nobla tribunuso!» De flanke nekonataj homoj tiel premis la portilon, ke Ataceno

<sup>169</sup> Latine *lampadarii* — portantoj de torĉoj (lat. *lampadēs*).

ordonis al la sklavoj peli ilin for per bastonoj.

Subite krio leviĝis en la fronto de la irantaro, en unu momento estingiĝis ĉiuj lumoj. Ĉirkaŭ la portilo iĝis interpremo, tumulto, batalo.

Ataceno ekkomprenis: tio estis simple atako. Kaj ekkompreninte, li rigidiĝis. Ĉiuj sciis, ke Nerono ofte, por sin distri, faras atakojn kun aro da aŭgustanoj<sup>170</sup>, tiel en Suburo, kiel en aliaj kvartaloj de la urbo. Oni sciis, ke fojfoje li rikoltis en tiuj noktaj ekskursoj tuberojn kaj kontuzojn, sed tiun, kiu sin defendis, renkontis morto, eĉ se li estus senatano. La domo de la *vigiloj*, kies devo estis gardi ordon en la urbo, ne estis tre malproksime, sed en similaj okazoj la gardistoj ŝajnigis, ke ili estas surdaj kaj blindaj. Dume ĉirkaŭ la portilo bolis; homoj komencis lukti, batali, terenĵeti kaj piedpremi unu alian. La kapon de Ataceno trafumis la penso, ke li devas savi antaŭ ĉio Ligian kaj sin mem, kaj la ceteron lasi al la sorto. Eltirinte ŝin el la portilo, li kaptis ŝin sur la brakojn kaj penis sin forŝteli en la mallumo.

Sed Ligia komencis voki:

— Urso! Urso!

Ŝi estis blanke vestita, do facile rimarkebla. Ataceno provis per sia dua, libera mano rapide ŝin kovri per sia

<sup>170</sup> Latine *augustiani* — sekvantaro de Nerono, junuloj el kavaliraj familioj, kiuj agis kiel lia fan-klubo kaj aplaŭdistaro.

mantelo, kiam subite lian nukon kaptis kvazaŭ terura preniligo kaj sur lian kapon falis, kiel ŝtono, grandega, frakasanta bulo.

Kaj li falis en unu momento, kiel bovo frapita per batilo antaŭ altaro de Jovo.

La sklavoj pliparte kuŝis sur la tero, aŭ savis sin, disbatante sin en densa mallumo kontraŭ muraj elstarajoj. Sur la loko restis nur la portilo, frakasita en la tumulto. Urso forportis Ligian al Suburo, liaj kunuloj sekvis lin, grade disiĝante dum la vojo.

Sed la sklavoj komencis kolekti sin antaŭ la domo de Vinicio kaj interkonsenti. Ili ne kuraĝis eniri. Post mallonga interkonsento ili revenis al la batalloko, kie ili trovis kelkajn senvivajn korpojn, kaj inter ili la korpon de Ataceno. Tiu ĉi konvulsiis ankoraŭ, sed post momenta pli forta tremo li streĉiĝis kaj restis senmova.

Tiam ili kunprenis lin kaj reveninte, haltis denove antaŭ la pordego. Oni devis tamen konigi al la sinjoro, kio okazis.

— Gulono diru, — komencis flustri kelkaj voĉoj, — sango fluas de lia vizaĝo, kiel de la niaj, kaj la sinjoro lin amas. Por Gulono estas malpli danĝere ol por la aliaj.

Kaj Gulono, ĝermano, maljuna sklavo, kiu iam vartis Vinicion kaj estis de li heredita de la patrino, la fratino de

Petronio, diris:

— Mi diros, sed ni iru ĉiuj kune. Lia kolero ne falu sur min solan.

Vinicio komencis jam dume tute senpacienci. Petronio kaj Ĥrizotemiso priridis lin, sed li marŝis per rapidaj paŝoj tra la atrio, ripetante:

— Ili jam devus veni!... Ili jam devus veni!...

Kaj li volis iri, sed la du aliaj retenis lin.

Subite tamen en la vestiblo aŭdiĝis paŝoj; en la atrion enkuris grandare la sklavoj, kaj, rapide ekstarinte ĉe la muro, komencis ripeti per ĝemaj voĉoj:

— Aaaa!... aa!

Vinicio saltkuris al ili.

— Kie estas Ligia? — li ekkriis per terura, ŝanĝita voĉo.

— Aaaa!!!...

Tiam Gulono elpaŝis antaŭen kun sia sangokovrita vizaĝo, ekkriante rapide kaj ploreme:

— Jen sango, sinjoro! Ni defendis ŝin! Jen sango, sinjoro! Jen sango!...

Sed li ne povis fini, ĉar Vinicio kaptis bronzan kandel-  
ingon kaj per unu frapo frakasis la kranion de la sklavo,  
poste, preminte sian kapon per la manoj, enigis la fingr-

ojn inter la harojn, ripetante raŭke:

— *Me miserum! Me miserum!*<sup>137</sup>

Lia vizaĝo iĝis ruĝblua, la okuloj forkuris sub la frunt-on, ŝaŭmo aperis sur lia buŝo.

— Vergojn!!! — li ekmuĝis per nehoma voĉo.

— Sinjoro! Aaaa!... kompatu! — ĝemis la sklavo.

Sed Petronio leviĝis kun esprimo de malplaĉo sur la vizaĝo.

— Ni iru, Ĥrizotemiso! — li diris, — se ci volas rigardi viandon, mi ordonos priabi vendejon de buĉisto ĉe Karioj.

Li eliris el la atrio, kaj en la tuta domo, ornamita per verdaĵo de hederoj kaj preta al festeno, eksonis post momento ĝemoj kaj fajfado de vergoj, kiuj daŭris ĝis la mateno.

<sup>137</sup> *heu, me miserum!* (lat.) — ve, mi malfeliĉa!

## Ĉapitro 11<sup>a</sup>

Tiun nokton Vinicio tute ne enlitiĝis. Ian tempon post la foriro de Petronio, kiam la ĝemoj de la skurĝataj sklavoj povis kvietigi nek lian doloron, nek la furiozon, li kolektis aron da aliaj servistoj kaj fronte de ili, jam en malfrua nokto, elkuris por serĉi Ligian. Li vizitis la eskvilinan kvartalon, poste Suburon, la Fian straton kaj ĉiujn apudajn stratetojn. Post tio, ĉirkaŭirinte Kapitolon, li atingis, tra la ponto de Fabricio, la insulon, kaj trakuris fine la transtiberan parton de la urbo. Sed tio estis sencela kurado, ĉar li mem ne esperis trovi Ligian, kaj se li serĉis ŝin, li faris tion ĉefe por plenigi per io la teruran nokton. Efektive li revenis hejmen nur tagiĝe, kiam en la urbo jam komencis aperi veturiloj kaj muloj de legomvendistoj kaj kiam bakistoj estis jam malfermantaj siajn vendejojn. Reveninte, li ordonis forigi la korpon de Gulono, kiun neniu kuraĝis tuŝi ĝis nun, poste tiujn sklavojn, al kiuj oni forkaptis Ligian, li ordonis sendi en kamparajn punlaborejojn, kio estis puno preskaŭ pli terura ol morto, fine, ĵetinte sin sur remburlitan benkon en la atrio, li komencis pensi, kiamaniere li retrovos kaj reprenos Ligian.

Rezigni ŝin, perdi ŝin, ne revidi ŝin plu ŝajnis al li nebla, kaj ĉe la nura penso pri tio kaptis lin furiozo. La



memvola naturo de la juna soldato unuafoje en la vivo trafis kontraŭstaron, alian nerompeblan volon, kaj simple ne povis kompreni, kiel povas okazi, ke iu kuraĝas kontraŭmeti sin al lia pasio. Vinicio preferus eĉ, ke la mondo kaj la Urbo falu en rubojn ol ke li ne atingu tion, kion li volas. Oni forigis kalikon da volupto preskaŭ de antaŭ lia buŝo, do ŝajnis al li, ke estas plenumita io neordinara, vokanta pri venĝo al leĝoj diaj kaj homaj.

Sed antaŭ ĉio li ne volis kaj ne povis paciĝi kun la sorto, ĉar neniam li ion tiom avidis en la vivo, kiel Ligian. Ŝajnis al li, ke sen ŝi li ne kapablos ekzisti. Li ne sciis respondi, kion li farus sen ŝi morgaŭ, kiel li povus travivi la sekvontajn tagojn. Kelkfoje kaptis lin kontraŭ ŝi kolero proksima al frenezo. Li volus havi ŝin por ŝin bati, treni je la haroj en la dormoĉambron kaj turmenti ŝin, kaj jen ekregadis lin grandega sopiro je ŝia voĉo, figuro, okuloj, kaj li sentis, ke li estus preta kuŝi ĉe ŝiaj piedoj. Li vokis ŝin, mordis la fingrojn, ĉirkaŭprenis la kapon per la manoj. Li kolektis ĉiujn fortojn por igi sin pensi trankvile pri ŝia reakiro, sed li ne povis. Lian kapon trakuris miloj da pensoj kaj rimedoj, sed unuj pli frenezaj ol aliaj. Fine trabrilis ĝin la penso, ke neniu alia ŝin forkaptis ol Aŭlo, kaj ke en plej malbona okazo Aŭlo devas scii, kie ŝi sin kaŝas.

Kaj li saltleviĝis por kuri en la domon de Aŭlo. Se ili

ne redonos ŝin al li, se ili ne ektimos minacojn, li iros al la imperiestro, akuzos la maljunan komandanton pri malobeo kaj ricevos kontraŭ li mortverdikton, antaŭe tamen li havigos de ili konfesion, kie estas Ligia. Sed eĉ se ili ŝin redonos propravole, eĉ tiam li venĝos. Ili akceptis lin, vere, en sian domon kaj flegis, sed tio estas nenio. Per tiu sola malbonago ili liberigis lin de ĉia dankemo. Kaj lia venĝema kaj senpardona animo komencis ĝui la personon pri la malespero de Pomponia Grecina, kiam al la maljuna Aŭlo centuriestro alportos mortverdikton. Li estis preskaŭ certa, ke li ĝin ricevos. Petronio helpas lin en tio. Cetere Nerono mem nenion rifuzas al siaj kamaradoj aŭgustanoj, se nur al rifuzo ne instigas lin persona malsimpatio aŭ pasio.

Sed subite la koro haltis en li sub la influo de terura supozo.

Kaj se Nerono mem forkaptis Ligian?

Ĉiuj sciis, ke Nerono ofte serĉas en noktaj atakoj distron en enuo. Eĉ Petronio partoprenis kelkfoje en tiuj amuzoj. Ilia ĉefa celo estis, vere, kapti virinojn kaj surprizeti ilin, ĝis sveno, sur soldata mantelo. Tamen Nerono mem nomis kelkfoje tiajn ekskursojn «perloserĉado», ĉar okazadis, ke en la fundo de la kvartaloj, okupataj de svarmanta, malriĉa loĝantaro, oni trovis veran perlon de ĉarmo kaj juneco. Tiam la *sagatio*, kiel oni nomis la

suprenĵetadon sur soldata mantelo, ŝanĝis sin en veran forkapton kaj la «perlon» oni sendis aŭ sur Palatinon, aŭ en iun el la sennombraj vilaoj de la imperiestro, aŭ fine, Nerono cedis ŝin al iu el siaj kamaradoj. Tiel povis okazi ankaŭ al Ligia. Nerono observis ŝin dum la festeno, kaj Vinicio ne dubis eĉ por momento, ke ŝi devis ekŝajni al li la plej bela el ĉiuj virinoj, kiujn li vidis ĝis nun. Kiel do povus esti alie? Nerono havis ŝin, vere, ĉe si sur Palatino, kaj povis malkaŝe ŝin reteni, sed, kiel prave diris Petronio, Nerono ne havis kuraĝon en krimoj kaj, povante agi malkaŝe, li ĉiam preferis agi kaŝe. Ĉi-foje povis lin instigi al tio ankaŭ timo antaŭ Popea.

Al Vinicio venis nun la ideo, ke Aŭlo eble ne kuraĝus perforte forkapti la knabinon, donacitan al li de la imperiestro. Kiu cetere kuraĝus? Ĉu eble tiu grandega ligio kun bluaj okuloj, kiu kuraĝis tamen eniri en la triklinion kaj elporti ŝin sur la brakoj el la festenejo? Sed kien li rifuĝus kun ŝi, kien li povus ŝin konduki? Ne, sklavo ne riskus tian entreprenon. Sekve, tion faris neniu alia ol Nerono.

Ĉe tiu penso la okulojn de Vinicio vualis mallumo kaj ŝvitgutoj kovris lian frunton. En tiu okazo Ligia estis perdita por ĉiam. Nun li povis, pli prave ol antaŭe, ripeti: *Væ misero mihi!*<sup>171</sup> La imago prezentis al li Ligian en la brakoj

<sup>171</sup> Voĉlegu [ve mízero mihi] (lat.) — ve al mi malfeliĉa!

de Nerono, kaj la unuan fojon en la vivo li ekkomprenis, ke estas pensoj, kiujn homo simple ne povas elporti. Nur nun li ekvidis, kiel li ŝin amis. Kiel dronanto en fulmrapi-  
 daj bildoj rememoras sian tutan vivon, tiel li rememoris Ligian. Li vidis ŝin, aŭdis ĉiun ŝian vorton. Li vidis ŝin ĉe la fontano, li vidis ŝin ĉe Aŭlo kaj ĉe la festeno. Denove li sentis ŝin proksime, sentis la odoron de ŝiaj haroj, la varmon de ŝia korpo, la volupton de la kisoj, per kiuj li disprematis dum la festeno ŝian senkulpan buŝon. Ŝi ek-  
 ŝajnis al li centoble pli bela, pli dezirinda, pli dolĉa, centoble pli sol-elektita el inter ĉiuj mortulinoj kaj ĉiuj diinoj ol iam ajn antaŭe. Kaj kiam li ekpensis, ke ĉion tion, kio enradikiĝis en lian koron, kio iĝis lia sango kaj vivo, povus ekposedi Nerono, kaptis lin doloro tute fizika, tiel terura, ke li volus bati per la kapo la murojn de la atrio, ĝis li ilin frakasos. Li sentis, ke li povus freneziĝi kaj ke li freneziĝus sendube, se ne restus al li ankoraŭ venĝo. Tiu sola penso estis por li ioma konsolo. «Mi estos cia Kasio Hereo!» — li ripetadis al si, pensante pri Nerono. Post momento, kaptinte en la manojn iom da tero el florvazoj, starrantaj ĉirkaŭ la pluvujo, li faris teruran ĵuron al Hekato<sup>172</sup>, Erebo<sup>173</sup> kaj siaj hejmaj laroj, ke li plenumos la venĝon.

<sup>172</sup> **Hekato** [NPIV] (gr. Ἑκάτη) — malnovgreka diino triforma, luna, mara kaj infera.

<sup>173</sup> **Erebo** [PIV] (gr. Ἔρεβος) — (mit.) personigo de la infera mallumo, filo

Kaj li eksentis efektive konsolon. Li sciis nun por kio vivi kaj per kio plenigi la tagojn kaj noktojn. Poste, lasinte la ideon iri al Aŭlo, li ordonis porti sin sur Palatinon. Dumvoje li pensis, ke se oni ne allasos lin al la imperiestro aŭ volos kontroli, ĉu li kunhavas armilon, tio estos pruvo, ke Ligian forkaptis Nerono. Li ne prenis tamen armilon. Li perdis la konscion pri siaj agoj ĝenerale, sed, kiel ordinare la homoj, absorbitaj per unu penso, li konservis ĝin en tio, kio koncernis la venĝon. Li ne volis, ke ĝi iĝu antaŭtempe vana. Krome, li deziris antaŭ ĉio vidi Akteon, supozante, ke de ŝi li povos ekscii la veron. En momentoj trafulmis lin la espero, ke eble li vidos ankaŭ Ligian, kaj ĉe tiu penso li komencis tremi. Eble ja Nerono forkaptis ŝin, ne sciante, kiun li forkaptas, kaj hodiaŭ redonos ŝin al li? Sed post momento li forĵetis tiun supozon. Se oni volus resendi ŝin al li, oni ŝin resendus hieraŭ. Akteo sola povis ĉion klarigi, kaj ŝin li devis vidi antaŭ la aliaj.

Konfirminte sin en sia supozo, li ordonis al la sklavoj plirapidigi la paŝojn, envoje pensante senorde jen pri Ligia, jen pri la venĝo. Li aŭdis, ke pastroj de la egipta diino Paĥto scipovas venigi malsanon sur kiun ajn ili volas, kaj li decidis ekscii de ili la rimedon. En Oriento oni ankaŭ diris al li, ke la judoj konas iajn sorĉformulojn, per kiuj ili

kovras per abscesoj la korpojn de malamikoj. Li havis hejme, inter siaj sklavoj, dekelkajn judojn, do li promesis al si, ke, reveninte, li ordonos ilin vipi, ĝis ili malkaŝos al li tiun sekreton. Kun plej granda plezuro li tamen pensis pri mallonga romana glavo, kiu elverŝas torentojn da sango, tiajn ĝuste, kiaj elŝprucis el Gajo Kaligulo kaj lasis neforviŝeblajn makulojn sur la portika kolono. Li estis nun preta murdi la tutan Romon, kaj se iuj venĝemaj dioj promesus al li, ke ĉiuj homoj formortos, krom li kaj Ligia, li konsentus tion.

Antaŭ la arko li kolektis la tutan sobrecon de la pensoj kaj, ĉe la vido de pretorianoj, ekpensis, ke se ili eĉ en plej malgranda grado ĝenos lian eniron, ĝi estos pruvo, ke Ligia estas, laŭ la volo de la imperiestro, en la palaco. Sed la supera centuriestro ridetis al li amike, kaj, proksimiĝinte je kelkaj paŝoj, diris:

— Saluton al ci, nobla tribunuso. Se ci deziras riverenci antaŭ la imperiestro, ci venis en malbona momento kaj mi ne scias, ĉu ci povos lin vidi.

— Kio okazis? — demandis Vinicio.

— La dia malgranda aŭgustino subite malsaniĝis hieraŭ. La imperiestro kaj la aŭgustino Popea estas ĉe ŝia lito kun kuracistoj, kiujn oni venigis el la tuta urbo.

Tio estis grava okazo. Nerono, kiam naskiĝis al li tiu

filino, simple frenezis pro feliĉo kaj akceptis ĝin *extra humanum gaudium*<sup>174</sup>. Antaŭ la akuŝo la senato plej solene rekomendis al la dioj la sinon de Popea. Oni faris votojn kaj aranĝis en Ancio, kie la akuŝo okazis, grandiozajn cirkludojn, krom tio oni konstruis templon al la du Fortunoj. Nerono, kiu en nenio sciis gardi la mezuron, senmezure amis ĉi tiun infanon, kaj al Popea ĝi estis kara almenaŭ tial, ĉar ĝi konfirmis ŝian pozicion kaj faris ŝian influon nerezistebla.

De la sano kaj vivo de la malgranda aŭgustino povis dependi la sorto de la tuta imperio, sed Vinicio estis tiel okupita de si mem, per sia afero kaj sia amo, ke, preskaŭ ne turninte atenton al la novaĵo de la centuriestro, li respondis:

— Mi volas paroli nur kun Akteo.

Kaj li trairis.

Tamen ankaŭ Akteo estis okupita ĉe la infano kaj li devis longe ŝin atendi. Ŝi venis nur ĉirkaŭ la tagmezo, kun vizaĝo laca kaj pala, kiu ĉe la vido de Vinicio ankoraŭ pli paliĝis.

— Akteo, — ekkriis Vinicio, kaptante ŝiajn manojn kaj tirante ŝin en la mezon de la atrio, — kie estas Ligia?

— Mi volis cin demandi pri tio, — ŝi respondis, rigard-

<sup>174</sup> *extra humanum gaudium* [ekstra ... gáudium] (lat.) — superhoma ĝojo.

ante riproĉe en liajn okulojn.

Kaj Vinicio, kvankam li promesis al si, ke li pridemandos ŝin trankvile, denove premis la kapon per la manoj kaj komencis ripeti kun vizaĝo tordita de doloro kaj koleoro:

— Ŝi estas for. Oni forkaptis ŝin en la vojo.

Post momento li tamen sin ekregis denove kaj, proksimiginte la vizaĝon al la vizaĝo de Akteo, ekparolis tra kunpremitaj dentoj:

— Akteo ... Se cia vivo estas al ci kara, se ci ne volas esti kaŭzo de malfeliĉoj, kiujn ci eĉ ne povas imagi, respondu al mi la veron: ĉu ne Nerono ŝin forkaptis?

— La imperiestro ne forlasis hieraŭ la palacon.

— Je la ombro de cia patrino, je ĉiuj dioj! Ĉu ŝi ne estas en la palaco?

— Je la ombro de mia patrino, Marko — ŝi ne estas en la palaco kaj ne Nerono ŝin forkaptis. Hieraŭ malsaniĝis la malgranda aŭgustino, kaj Nerono ne foriĝas de ŝia lulilo.

Vinicio ekspiris. Tio, kio ŝajnis al li plej terura, ĉesis lin minaci.

— Sekve, — li diris, sidiĝante sur benkon kaj kunpremanante la pugnojn, — forkaptis ŝin Aŭlo, kaj tial ve al li!

— Aŭlo Plaŭcio estis ĉi tie hodiaŭ matene. Li ne povis



paroli kun mi, ĉar mi estis okupita ĉe la infano; sed li demandis pri Ligia Epafroditon kaj aliajn el la imperiestra servantaro, kaj poste li sciigis ilin, ke li venos ankoraŭ por paroli kun mi.

— Li volis deturni de si la suspektojn. Se li ne sciis, kio okazis kun Ligia, li venus serĉi ŝin en mian domon.

— Li lasis al mi sur tabuleto kelkajn vortojn, el kiuj ci vidos, ke, sciante, ke Ligia estis forprenita el lia domo laŭ la peto de ci kaj de Petronio, li kredis, ke ŝi estas sendita al ci, kaj li estis hodiaŭ matene en cia domo, kie oni diris al li, kio okazis.

Dirinte tion ŝi iris en la dormoĉambron kaj post momento revenis kun la tabuleto, kiun Aŭlo lasis al ŝi.

Vinicio tralegis kaj eksilentis; Akteo dume ŝajnis legi liajn pensojn en la malserena vizaĝo, ĉar post momento ŝi diris:

— Ne, Marko. Okazis tio, kion Ligia mem volis.

— Ci sciis, ke ŝi volas forkuri! — eksplodis Vinicio.

Kaj ŝi rigardis lin per siaj nebulaj okuloj preskaŭ severe.

— Mi sciis, ke ŝi ne volas iĝi cia konkubino.

— Kaj ci mem kio estis la tutan vivon?!

— Mi estis antaŭe sklavino.

Sed Vinicio ne ĉesis ekscitiĝi: la imperiestro donacis al

li Ligian, do li ne bezonas demandi, kio ŝi estis antaŭe. Li retrovos ŝin eĉ sub la tero kaj faros ŝin ĉio, kio plaĉos al li. Jes! Ŝi estos lia konkubino. Li ordonos ŝin vipi, kiomfoje plaĉos al li. Kiam ŝi enuigos lin, li fordonos ŝin al la lasta el siaj sklavoj aŭ devigos ŝin turnadi muelŝtonojn en liaj posedaĵoj en Afriko. Li serĉos ŝin nun kaj retrovos nur por ŝin rompi, piedpremi kaj humiligi.

Kaj, ekscitante sin ĉiam pli, li perdis ĉian mezuron ĝis tia grado, ke eĉ Akteo ekkomprenis, ke li minacis pli multe ol li kapablas plenumi, kaj ke per lia buŝo parolas kole-ro kaj sufero. La suferon ŝi kompatus, sed la superplena mezuro elĉerpis ŝian paciencon tiel, ke fine ŝi demandis lin, kial li venis al ŝi?

Vinicio ne tuj trovis respondon. Li venis al ŝi, ĉar li tiel volis, ĉar li kredis, ke ŝi donos al li iajn informojn, sed, ĝuste dirante, li venis nur al la imperiestro, kaj ne povante kun li paroli, vizitis ŝin. Ligia, forkurante, malobeis la volon de la imperiestro, do li petos la imperiestron, ke li ordonu ŝin serĉi, eĉ se oni devus uzi por tio ĉiujn legiojn kaj revizii unu post alia ĉiujn domojn en la tuta imperio. Petronio subtenos lian peton kaj la serĉado estos komencita de hodiaŭ.

Je tio Akteo diris:

— Gardu cin, ke ci ne perdu ŝin por eterne, ĝuste tiam,

kiam oni retrovos ŝin laŭ la ordono de la imperiestro.

Vinicio sulkigis la brovojn.

— Kion tio signifas? — li demandis.

— Aŭskultu min, Marko! Hieraŭ mi estis kun Ligia en la ĉi tieaj ĝardenoj; tie ni renkontis Popean kaj kun ŝi la malgrandan aŭgustinon, kiun portis la negrino Lilito. Vespere la infano malsaniĝis, kaj Lilito asertas, ke ĝi estis sorĉtrafita, kaj ke la sorĉon ĵetis tiu fremdlandulino, kiun ili renkontis en la ĝardeno. Se la infano resaniĝos, oni forgesos pri tio, sed en la kontraŭa okazo Popea kiel unua akuzos Ligian pri sorĉo, kaj tiam, kie ajn oni ŝin retrovos, ne estos por ŝi rimedo de savo.

Sekvis momento da silento, post kio Vinicio ekparolis:

— Kaj eble ŝi sorĉis ŝin: ja ankaŭ min ŝi sorĉis.

— Lilito certigas, ke la infano ekploris tuj, kiam ŝi transportis ĝin preter ni. Vere estas! Ĝi ekploris. Certe oni elportis ĝin en la ĝardenojn jam malsana. Marko, serĉu ŝin mem, kie ci volas, sed antaŭ ol la malgranda aŭgustino resaniĝos, ne parolu pri ŝi kun Nerono, ĉar ci faligos sur ŝin venĝon de Popea. Sufiĉe jam ŝiaj okuloj ploris pro ci, kaj gardu nun ĉiuj dioj ŝian senkulpan kapon.

— Ĉu ci amas ŝin, Akteo? — demandis Vinicio.

Kaj en la okuloj de la liberigitino ekbrilis larmoj.

— Jes! Mi ekamis ŝin.

— Ĉar ŝi ne repagis al ci per malamo, kiel al mi.

Akteo rigardis lin dum momento, kvazaŭ hezitante aŭ penante konvinkiĝi, ĉu li parolis sincere, post kio ŝi respondis:

— Homo flamiĝema kaj blinda! Ŝi amis cin.

Sub la influo de tiuj vortoj Vinicio saltleviĝis, kiel freneza:

— Malvere!

Ŝi malamis lin. Kiel Akteo povas scii!? Ĉu post unutaĝa konateco Ligia faris al ŝi konfeson? Kia amo ĝi estas, se ĝi preferas vagan vivon, malhonoron de malriĉeco, necertecon pri morgaŭa tago, kaj eble eĉ mizeran morton ol florornamitan domon, kie atendas kun festeno la amato! Li prefere ne aŭdu tiajn vortojn, ĉar li povas freneziĝi. Jen, li ne fordonus tiun knabinon por ĉiuj trezoroj de tiu ĉi palaco, kaj ŝi forkuris. Kia amo ĝi estas, se ĝi timas volupton kaj naskas doloron! Kiu tion scias? Kiu povas tion kompreni? Se li ne esperus ŝin trovi, li dronigus en si glavon! Amo sin donas, ne forprenas. Ĉe Aŭlo estis momentoj, kiam li mem kredis proksiman feliĉon, sed nun li scias, ke ŝi lin malamis, malamas kaj mortos kun malamo en la koro.

Sed Akteo, ordinare timema kaj milda, eksplodis siavice per indigno: Kiel li do penis ŝin akiri? Anstataŭ rive-

rence peti ŝin de Aŭlo kaj Pomponia, li ruze forprenis la infanon de la gepatroj. Li volis ŝin fari ne edzino, sed konkubino, ŝin, zorgatinon de nobla domo, ŝin, reĝan filinon. Kaj li venigis ŝin ĉi tien, en la domon de krimo kaj malvirto, ofendis ŝiajn okulojn per la vido de senhonta festeno; li kondukis al ŝi, kiel al malĉastulino. Ĉu li forgesis, kio estas la domo de Aŭlo kaj kiu estas Pomponia Grecina, kiu edukis Ligian? Ĉu li ne havas sufiĉe da saĝo por diveni, ke ili estas aliaj virinoj ol Nigidia, ol Kalvia Krispinilla, ol Popea kaj ĉiuj, kiujn li renkontas en la imperiestra palaco? Ĉu, ekvidinte Ligian, li ne komprenis tuj, ke ŝi estas ĉasta knabino, kiu preferas morton ol malhonoron? De kie li scias, kiajn diojn ŝi konfesas, kaj ĉu ne pli purajn, ne pli bonajn ol la voluptema Venero aŭ ol Izido, kiun adoras malĉastaj romaninoj? Ne, Ligia faris al ŝi nenian konfesion, sed diris, ke ŝi atendas savon de li, de Vinicio; ŝi esperis, ke li elpetos por ŝi de la imperiestro revenon hejmen kaj ke li redonos ŝin al Pomponia. Kaj parolante pri tio, ŝi flamis surprizaĝe, kiel knabino, kiu amas kaj fidas. Ankaŭ ŝia koro batis por li, sed li mem ŝin teruris, fortimigis, indignigis, kaj nun li serĉu ŝin pere de imperiestraj soldatoj, sed sciu, ke se la infano de Popea mortos, sur ŝin falos la suspekto, kaj ŝia pereco estos neevitebla.

La koleron kaj doloron de Vinicio komencis trapenetri

kortuŝo. La novaĵo, ke Ligia lin amis, ekskuis ĝisfunde lian animon. Li rememoris ŝin en la ĝardeno ĉe Aŭlo, kiam ŝi aŭskultis liajn vortojn kun flamoj sur la vizaĝo kaj kun okuloj plenaj je lumo. Ekŝajnis al li, ke tiam ŝi efektive komencis lin ami, kaj subite ĉe tiu penso ekregis lin sento de ia feliĉo, centoble pli granda eĉ ol tiu, kiun li deziris. Li ekpensis, ke efektive li povus havi ŝin memvolanta, kaj krom tio amanta. Jen ŝi ĉirkaŭŝpinus lian pardonon, ŝmirus ĝin per lupa graso kaj poste eksidus, kiel lia edzino, sur ŝafa lano, ĉe lia hejma fajro. Jen li aŭdus el ŝia buŝo la sakramentan: «Kie ci, Gajo, tie mi Gaja»<sup>175</sup> kaj ŝi por ĉiam estus lia. Kial li tiel ne agis? Li ja estis preta. Kaj nun li ne havas ŝin, nek povas ŝin trovi, kaj se li retrovus, li povus ŝin pereigi, kaj eĉ se li ŝin ne pereigus, akceptos lin plu nek Aŭlo, nek ŝi mem.

Ĉe tio kolero de nove komencis hirtigi la harojn sur lia kapo, sed nun ĝi ne plu sin turnis kontraŭ Aŭlo aŭ Ligia, sed kontraŭ Petronio. Li estis kulpa pri ĉio. Se ne estus liaj konsiloj, Ligia ne bezonus nun vagi senhejme, ŝi estus lia fianĉino kaj nenia danĝero pezus super ŝia kara kapo. Sed nun tio fariĝis, kaj tro malfrue estis malfari la malbonon, kiu ne estas malfarebla.

— Tro malfrue!

<sup>175</sup> Latine *Ubi tu Cajus, (ibi) ego Cajo* — geedziĝrita formulo prononcata de la fianĉino.

Kaj ŝajnis al li, ke abismo malfermiĝis antaŭ liaj piedoj. Li ne sciis, kion entrepreni, kiel ekagi, kien sin turni. Akteo ripetis, kiel eĥo, la vortojn: «tro malfrue», kio, en fremda buŝo, eksonis al li, kiel mortverdikto. Li komprenis nur unu aferon — ke li devas trovi Ligian, ĉar alie okazos kun li io malbona.

Kaj, aŭtomate volvinte ĉirkaŭ si la togon, li jam volis foriri, ne adiaŭante Akteon, kiam la kurteno, apartiganta la vestiblon de la atrio, ŝoviĝis flanken, kaj subite li ekvidis antaŭ si la funebran figuron de Pomponia Grecina.

Evidente ankaŭ ŝi eksciis jam pri la malapero de Ligia kaj, supozante ke estos por ŝi pli facile ol por Aŭlo paroli kun Akteo, ŝi venis peti de ŝi informojn.

Sed, ekvidinte Vinicion, ŝi turnis al li sian etan, palan vizaĝon kaj, post momento, diris:

— Marko, Dio pardonu al ci la malbonon, kiun ci faris al ni kaj al Ligia.

Kaj li staris kun mallevita frunto, kun sento de malfeliĉo kaj kulpo, ne komprenante, kiu dio devis kaj povis lin pardoni, nek kial Pomponia parolis pri pardono, dum ŝi devus paroli pri venĝo.

Fine li eliris kun kapo senhelpa, plena je pezaj pensoj, de grandega zorgo kaj miro.

Sur la korto kaj sub la galerio staris maltrankvilaj aroj

da homoj. Inter la palacaj sklavoj oni vidis kavalirojn kaj senatanojn, kiuj venis informiĝi pri la sano de la malgranda aŭgustino, kaj kune montri sin en la palaco kaj prezenti la pruvon de sia kunsento almenaŭ al la imperiestraj sklavoj. La famo pri la malsano de la «diino» videble rapide disvastiĝis, ĉar en la pordego aperadis ĉiam novaj figuroj, kaj tra la eltranĉaĵo de la arko oni vidis tutajn amasojn da homoj. Kelkaj el la venintoj, vidante, ke Vinicio eliris el la palaco, retenis lin por demandi pri novaĵoj, sed li, ne respondante, iris rekte pluen, ĝis Petronio, veninta kiel la aliaj por informiĝi, preskaŭ puŝis lin per la brusto kaj haltigis.

Vinicio sendube ekbolus de kolero je lia vido kaj plenumus ion kontraŭleĝan en la imperiestra palaco, se li ne estus foririnta de Akteo kvazaŭ rompita, en la stato de tia senfortiĝo kaj premiteco, ke forlasis lin eĉ lia denatura ekscitemo. Li forŝovis tamen Petronion kaj volis preterpasi, sed tiu lin haltigis preskaŭ perforte.

— Kiel fartas la dia aŭgustino? — li demandis.

Sed la perforto denove incitis Vinicion kaj tuj lin reflamigis.

— La infero englutu ŝin kaj tutan tiun domon! — li respondis, kunpremante la dentojn.

— Silentu, malfeliĉulo! — diris Petronio kaj rapide ri-



gardante ĉirkaŭen, aldonis:

— Se ci volas ekscii ion pri Ligia, venu kun mi. Ne! Ĉtie mi nenion diros. Venu kun mi, mi diros al ci miajn supozojn en la portilo.

Kaj, metinte la brakon ĉirkaŭ la junan viron, li elkondukis lin senprokraste el la palaco.

Sed tio estis lia ĉefa celo, ĉar neniajn novaĵojn li havis. Estante tamen homo helposcia, havante, krome, malgraŭ la hieraŭa indigno, multe da kompato por Vinicio, kaj fine, sentante certan respondecon pri ĉio okazinta, li jam ion entreprenis kaj, kiam ambaŭ eniris la portilon, li diris:

— Ĉe ĉiuj pordegoj mi postenigis miajn sklavojn, doninte al ili precizan priskribon de la knabino kaj de tiu grandegulo, kiu de la imperiestro elportis ŝin el la festenejo, ĉar estas por mi sendube, ke li estas tiu, kiu ŝin forkaptis. Aŭskultu min! Povas esti, ke Aŭlo volos ŝin kaŝi en unu el siaj kamparaj posedaĵoj, kaj en tiu okazo ni scios, en kiu direkto ili ŝin forkondukos. Kaj se ĉe la pordegoj oni ŝin ne ekvidos, tio estos pruvo, ke ŝi restis en la urbo, kaj ankoraŭ hodiaŭ ni komencos serĉadon.

— La Plaŭcioj ne scias, kie ŝi estas, — respondis Vinicio.

— Ĉu ci certas, ke tiel estas?

— Mi vidis Pomponian. Ankaŭ ili ŝin serĉas.

— Hieraŭ ŝi ne povis eliri el la urbo, ĉar nokte la pordegoj estas fermitaj. Po du el miaj sklavoj gvatas ĉe ĉiu pordego. Unu devas postiri Ligian kaj la grandegulon, kaj la alia reveni senprokraste por komuniki tion. Se ŝi estas en la urbo, ni ŝin retrovos, ĉar tiun ligion estas facile rekonigi, eĉ nur per la kresko kaj staturo. Ci estas feliĉa, ke ne Nerono ŝin forkaptis, kaj mi povas cin certigi, ke tiel ne estas, ĉar sur Palatino ne ekzistas antaŭ mi sekretoj.

Sed Vinicio eksplodis, pli ankoraŭ per dolorsento ol per kolero, kaj per voĉo, interrompata de emocio, komencis rakonti al Petronio, kion li aŭdis de Akteo kaj kiaj novaj danĝeroj ekpezis super la kapo de Ligia, danĝeroj tiel teruraj, ke pro ili, trovinte la forkurintojn, oni devos gardi ŝin plej zorge kontraŭ Popea. Poste li komencis maldolĉe riproĉi al Petronio liajn konsilojn. Sen li, ĉio irus alie. Ligia estus ĉe Aŭlo, kaj li, Vinicio, povus ŝin vidi ĉiutage kaj estus hodiaŭ pli feliĉa ol la imperiestro. Kaj eks-citiĝante laŭgrade de la rakonto, li subiĝadis ĉiam pli al la emocio, ĝis fine larmoj de bedaŭro kaj furiozo komencis guti el liaj okuloj.

Petronio, kiu simple ne supozis, ke la juna viro povus ami kaj avidi ĝis tia grado, vidante tiujn larmojn de mal-espero, diris al si interne kun certa miro:

— Ho potenca diino de Kipro, ci sola reĝas super la di-

oj kaj super la homoj!

## Ĉapitro 12<sup>a</sup>

Sed, kiam ili eliris el la portilo antaŭ la domo de Petronio, la atriestro komunikis al ili, ke neniu el la sklavoj, senditaj al la pordegoj, revenis ĝis nun. La atriestro ordonis porti al ili manĝaĵon kaj novan ordonon, ke ili, sub minaco de vippuno, zorge atentu ĉiujn, elirantajn el la urbo.

— Vidu, — diris Petronio, — sendube ili estas ĝis nun en la urbo, kaj en tiu okazo ni trovos ilin. Ordonu tamen ankaŭ al ciaj sklavoj gardi ĉe la pordegoj, nome al tiuj, kiuj estis senditaj por alkonduki Ligian, ĉar tiuj facile ŝin rekonos.

— Mi ordonis sendi ilin en la kamparajn punlaborejojn, — diris Vinicio, — sed tuj mi revokos la decidon: ili iru al la pordegoj.

Kaj, skribinte kelkajn vortojn sur vaksokovrita tabuleto, li transdonis ĝin al Petronio, kiu tuj sendigis ĝin en la domon de Vinicio.

Poste ili transiris en la internan portikon kaj tie, sidiĝinte sur marmora benko, komencis interparoli.

La orhara Eŭniko kaj Iriso ŝovis sub iliajn piedojn bronzaĵajn apogilojn, kaj poste, stariginte ĉe la benko tabl-

eton, komencis verŝi al ili vinon el belegaj mallarĝakolaj kruĉoj, kiajn oni venigadis el Volatero kaj Cecino.

— Ĉu ci havas inter ciaj servistoj iun, kiu konas tiun grandegan ligion? — demandis Petronio.

— Konis lin Ataceno kaj Gulono. Sed Ataceno pereis hieraŭ, kaj Gulonon mi mem mortigis.

— Mi bedaŭras lin, — diris Petronio. — Li vartis sur siaj brakoj ne nur cin, sed ankaŭ min.

— Mi eĉ intencis lin liberigi, — respondis Vinicio, — sed tio ne gravas. Ni parolu pri Ligia. Romo estas kiel maro...

— Perlojn oni trovas ĝuste en maro. Certe, ni ne trovos ŝin hodiaŭ, nek morgaŭ, sed ni trovos ŝin sendube. Nun ci min kulpigas, ke mi konsilis al ci tiun rimedon, sed la rimedo mem estis bona, kaj iĝis malbona nur tiam, kiam ĝi rezultigis malbonon. Ci aŭdis ja de Aŭlo mem, ke li intencas kun la tuta familio translokiĝi en Sicilion. Ankaŭ tiel la knabino estus for de ci.

— Mi postirus ilin, — respondis Vinicio, — kaj ĉiuokaze ŝi estus sekura, dume nun, se tiu infano mortos, Popea mem ekkredos kaj kredigos al Nerono, ke pri tio kulpas Ligia.

— Jes. Ankaŭ min tio maltrankviligis. Sed la bubino eble ankoraŭ resaniĝos. Kaj se ŝi mortos, eĉ tiam ni trovos

iun rimedon.

En tiu momento Petronio enpenŝiĝis kaj diris:

— Popea konfesas, laŭdire, la religion de la judoj kaj kredas je malbonaj spiritoj. Nerono estas superstiĉa. Se ni disvastigos la famon, ke Ligian forkaptis malbonaj spiritoj, oni ekkredos la famon, tiom pli, ke se forrabis ŝin nek Nerono, nek Aŭlo Plaŭcio, ŝi malaperis efektive mistere. La ligio, tute sola, ne povus tion plenumi. Li devus havi helpantojn, kaj kiel sklavo povus en unu tago kolekti tiom da homoj?

— Sklavoj helpas sin reciproke en la tuta Romo.

— Kiu iam pripagos tion per sia sango. Jes, ili helpas sin, sed ne unuj kontraŭ aliaj, kaj en ĉi tiu okazo oni sciis, ke sur la ciajn falos la respondeco kaj puno. Se ci sugestos al ciaj sklavoj la ideon pri malbonaj spiritoj, ili senprokraste konfirmos, ke ili vidis la spiritojn per siaj okuloj, ĉar tio tuj senkulpigos ilin antaŭ ci. Demandu iun prove, ĉu li vidis, kiel ili portis Ligian en la aero, kaj je la egido de Zeŭso li tuj ĵuros, ke tiel estis.

Vinicio, kiu mem estis superstiĉa, ekrigardis Petronion kun subita, grandega maltrankvilo.

— Se Urso ne povis havi helpantojn kaj ne povis forkapti ŝin sola, kiu do ŝin forkaptis?

Sed Petronio ekridis.

— Vidu, — li diris, — oni ekkredos, se eĉ ci jam duone kredas. Tia estas nia mondo, kiu mokas la diojn. Oni ekkredos kaj ne serĉos, kaj ni dume lokos ŝin ie for de la urbo, en unu el miaj aŭ ciaj vilaoj.

— Tamen, kiu povis ŝin helpi?

— Ŝiaj samkonfesantoj, — respondis Petronio.

— Kiaj? Kiun dion ŝi adoras? Mi devus scii tion pli bone ol ci...

— Preskaŭ ĉiu virino en Romo adoras alian dion. Estas sendube, ke Pomponia edukis ŝin en la kulto al tiu, kiun ŝi mem konfesas, sed kiun ŝi konfesas, mi ne scias. Unu afero estas certa — ke neniu ŝin vidis oferdonanta al niaj dioj en iu el niaj temploj. Oni eĉ akuzis ŝin, ke ŝi estas kristanino, sed tio estas nekredebla. La hejma tribunalo purigis ŝin de tiu suspekto. Pri la kristanoj oni diras, ke ne nur ili adoras azenkapon, sed estas malamikoj de la homa gento kaj plenumas plej malnoblajn krimojn. Sekve Pomponia ne povas esti kristanino, ĉar ŝia virto estas konata, kaj malamikino de la homa gento ne traktus siajn sklavojn tiel, kiel ŝi traktas.

— En neniu domo oni traktas ilin tiel, kiel ĉe Aŭlo, — interrompis Vinicio.

— Ci do vidas. Pomponia menciis pri iu dio, kiu estas, laŭ ŝia diro, unu, ĉiopova kaj kompatema. Kien ŝi kaŝis

ĉiujn aliajn, estas ŝia afero, sed certe estas, ke tiu ŝia Logoso ne estus ja tre ĉiopova, aŭ, kontraŭe, li devus esti tre mizera dio, se li havus nur du konfesantinojn: Pomponian kaj Ligian, plus ilia Urso. Sendube ili, tiuj konfesantoj, estas pli multaj, kaj ili helpis al Ligia.

— Tiu kredo ordonas pardoni, — diris Vinicio. — Mi renkontis ĉe Akteo Pomponian, kiu diris al mi: «Dio pardonu al ci la malbonon, kiun ci faris al Ligia kaj al ni.»

— Ilia dio estas videble kuratoro tre bonvolema. Ha, li cin pardonu, kaj signe de la pardono li redonu al ci la knabinon.

— Mi oferus al li hekatombon. Mi ne volas manĝon, nek trinkon, nek banon. Mi surmetos malhelan superveston kaj iros vagi tra la urbo. Eble alivestite mi trovos ŝin. Mi estas malsana!

Petronio rigardis lin kun certa kompatato. Efektive la okuloj de Vinicio subbluiĝis, la pupiloj brilis de febro; lia matene nerazita vizaĝo kovriĝis per malhela zono sur la fortliniaj makzeloj, la haroj estis en malordo kaj li aspektis vere malsana. Iriso kaj la orhara Eŭniko rigardis lin kunsente, sed li ŝajnis ne vidi ilin kaj ambaŭ, li kaj Petronio, tiel malatentis la ĉeeston de la sklavinoj, kiel ili malatentus hundojn ludantajn apud ili.

— Febro cin konsumas, — diris Petronio.

— Jes.

— Do aŭskultu min. Mi ne scias, kion konsilus al ci kuracisto, sed mi scias, kiel mi agus, estante en cia situacio. Jen, antaŭ ol tiu knabino estus retrovita, mi serĉus en alia tion, je kio senigis min la foresto de la unua. Mi vidis en cia domo belegajn korpojn. Ne neu al mi ... Mi scias, kio estas amo, kaj mi scias, ke kiam oni deziras unu virinon, alia ne povas ŝin anstataŭi. Sed en bela sklavino oni ĉiam povas trovi almenaŭ momentan distron...

— Mi ne volas! — respondis Vinicio.

Sed Petronio, kiu havis por li efektivan simpation kaj vere deziris moderigi lian suferon, komencis pripensi, kiel tion fari.

— Eble la ciaz ne havas plu por ci la ĉarmon de novaĵo, — li diris post mallonga tempo, — sed (ĉi-momente li komencis rigardi alterne Irison kaj Eŭnikon, kaj fine metis la manon sur la kokson de la orhara grekino) rigardu bone ĉi tiun ĥariton. Antaŭ kelkaj tagoj Fontejo Kapitono la pli juna proponis al mi por ŝi tri belegajn knabetojn el Klazomenoj, ĉar pli mirindan korpon certe eĉ Skopaso<sup>176</sup> ne kreis. Mi mem ne komprenas, kial ĝis nun mi restis indiferenta pri ŝi; ja ne detenis min la penso pri Ĥrizotemiso! Jen, mi ŝin donacas al ci, prenu ŝin.

<sup>176</sup> Malnovgreka arĥitekto kaj skulptisto (Σκόπας, 4<sup>a</sup> jc a.K.).



La orhara Eŭniko, aŭdinte tion, paliĝis en unu momento kiel tolo kaj, rigardante per teruritaj okuloj Vinicion ŝajnis, sen spiro en la brusto, atendi lian respondon.

Sed li saltleviĝis subite kaj, preminte la tempiojn per la manoj, komencis paroli rapide, kiel homo, kiu, konsumate de malsano, volas pri nenio aŭdi.

— Ne! Ne! Mi ne bezonas ŝin! Mi ne bezonas aliajn! Mi dankas cin, sed mi ne volas! Kaj mi iros serĉi Ligian en la urbo. Ordonu alporti al mi gaŭlan superveston kun kapuĉo. Mi iros trans Tiberon. Se mi povus ekvidi almenaŭ Urson!

Kaj li eliris rapide. Petronio, vidante, ke li efektive ne povas resti surloke, ne provis lin haltigi. Konsiderante tamen la rifuzon de Vinicio kiel momentan malinklinon al ĉiu virino, kiu ne estis Ligia, kaj ne volante, ke lia grandanimeco perdiĝu vane, li sin turnis al la sklavino kaj diris:

— Eŭniko, banu cin, parfumoleu cin kaj ornamu, kaj poste iru en la domon de Vinicio.

Sed ŝi falis antaŭ li sur la genuojn kaj kun manoj kunmetitaj komencis petegi, ke li ne forigu ŝin el sia domo. Ŝi ne iros al Vinicio kaj preferas ĉi tie portadi lignon en hipokaŭston ol tie esti la unua inter servistoj. Ŝi ne volas! Ne povas! Kaj ŝi petegas lin, ke li ŝin kompatu. Li ordonu ŝin skurĝi ĉiutage, nur ne forsendu ŝin el sia domo.

Kaj, tremante, kiel folio, tiel de timo, kiel de emocio, ŝi etendis al li la manojn, dum li aŭskultis ŝin kun mirego. Sklavino, kiu kuraĝas peti kontraŭ plenumo de ordono, kiu diras: «mi ne volas kaj ne povas», estis io tiel senekzempla en Romo, ke Petronio komence rifuzis kredi al siaj oreloj.

Fine li sulkgis la brovojn. Li estis tro granda estetikulo por esti kruela. Al liaj sklavoj, speciale koncerne la voluptaferojn, estis permesate pli ol al aliaj, sub la kondiĉo, ke ili modele plenumadu siajn servodevojn kaj la volon de la mastro respektu egale kun la dia. Se ili ne observis tiujn du devojn, Petronio sciis tamen ne avari la punojn, al kiuj ilin subigis la ĝenerala moro. Kaj ĉar krom tio li malamegis ankaŭ ĉiajn kontraŭaĵojn kaj ĉion, kio konfuzis lian trankvilon, tial, rigardinte dum momento la genuantion, li diris:

— Voku al mi Tirezion kaj revenu ĉi tien kun li.

Eŭniko leviĝis tremanta, kun larmoj en la okuloj, kaj foriris; post momento ŝi revenis kun la kretano Tirezio, la atriestro.

— Prenu Eŭnikon, — diris al li Petronio, — kaj donu al ŝi dudek kvin batojn, tiel tamen, ke ci ne difektu ŝian haŭton.

Dirinte ĉi tion li transiris en la bibliotekon kaj, sidiĝ-

inte ĉe tablo el rozkolora marmoro, komencis labori je sia «Festeno ĉe Trimalĥiono».

Sed la forkuro de Ligia kaj la malsano de la malgranda aŭgustino distris liajn pensojn, tiel ke li ne povis longe labori. Precipe tiu malsano estis grava okazo. En la kapon de Petronio venis la penso, ke se Nerono ekkredos, ke Ligia ĵetis sorĉon sur la malgrandan aŭgustinon, tiam la respondeco povos fali ankaŭ sur lin, ĉar oni venigis la knabino en la palacon laŭ lia peto. Li kalkulis tamen, ke ĉe la unua renkontiĝo kun Nerono li iel persvados al li la tutan absurdecon de simila supozo, kaj iom li kalkulis ankaŭ je certa inklino, kiun sentis al li Popea, vere kaŝante ĝin zorgeme, sed ne tiel zorgeme, ke li ĝin ne divenu. Post momento li movis eĉ la ŝultrojn je siaj timoj kaj decidis malsupreniri en la triklinion por iom manĝi kaj ordoni ankoraŭfoje porti sin al la palaco, poste sur la Kampon de Marso, kaj fine al Ĥrizotemiso.

Sed irante al la triklinio, ĉe enirejo al koridoro, destinita por la servistoj, li rimarkis subite, starantan ĉe la muro inter aliaj sklavoĵoj, la gracian figuron de Eŭniko kaj forgesinte, ke li ordonis al Tirezio nenion pli, krom ke li ŝin skurĝu, denove li sulkgigis la brovojn kaj komencis serĉi lin per la okuloj.

Ne trovinte lin tamen inter la servistoj, li sin turnis al

Eŭniko:

— Ĉu ci ricevis la skurĝopunon?

Kaj ŝi duafoje sin ĵetis al liaj piedoj, alpremis por momento al la buŝo la randon de lia togo, poste respondis:

— Ho jes, sinjoro! Mi ricevis! Ho jes, sinjoro!...

En ŝia voĉo sonis kvazaŭ ĝojo kaj dankemo. Ŝi kredis, evidente, ke la skurĝopuno devis anstataŭi al ŝi la forsendon el la domo kaj ke nun ŝi jam povas resti. Petronion, kiu tion komprenis, mirigis tiu pasia obstino de la sklavinino, sed li estis tro sperta konanto de la homa naturo por ne diveni, ke sole amo povis esti la kaŭzo de tia obstino.

— Ĉu ci havas amaton en ĉi tiu domo? — li demandis.

Ŝi levis al li siajn blujajn, larmajn okulojn kaj respondis tiel mallaŭte, ke oni apenaŭ povis ŝin aŭdi:

— Jes, sinjoro!...

Kun tiuj okuloj, kun haroj ĵetitaj malantaŭen, kun timo kaj espero sur la vizaĝo ŝi estis tiel belega, rigardis lin tiel petege, ke Petronio, kiu kiel filozofo mem proklamis la potencon de amo, kaj kiel estetikulo havis kulton al belo, eksentis por ŝi ian specon de kompatato.

— Kiu el ili estas cia amato? — li demandis, montrante la servistaron.

Sed al tio ne venis respondo, Eŭniko nur klinis la vizaĝon ĝis liaj piedoj kaj restis senmova.

Petronio rigardis la sklavojn, inter kiuj estis belaj kaj plaĉindaj junuloj, sed en neniu vizaĝo li povis ion legi, kaj ĉiuj nur surhavis iajn strangajn ridetojn; li do rigardis ankoraŭ dum momento Eŭnikon, kuŝantan ĉe liaj piedoj, kaj foriris silente al la triklinio.

Post la manĝo li ordonis porti sin al la palaco, kaj poste al Ĥrizotemiso, ĉe kiu li restis ĝis malfrua nokto. Sed, reveninte, li ordonis voki al si Tirezion.

— Ĉu Eŭniko ricevis la skurĝopunon?

— Jes, sinjoro. Ci ne permesis tamen difekti ŝian haŭton.

— Ĉu mi ordonis pri ŝi ion pli?

— Ne, sinjoro, — respondis maltrankvile la atriestro.

— Bone. Kiu el la sklavoj estas ŝia amanto?

— Neniu, sinjoro.

— Kion ci scias pri ŝi?

Tirezio komencis paroli per iom necerta voĉo:

— Eŭniko neniam forlasas nokte la dormoĉambron, kie ŝi dormas kun la maljuna Akriziono kaj Ifiso; neniam ŝi restas en la banejo post cia bano, sinjoro ... Aliaj sklavinuoj priridas ŝin kaj nomas ŝin Diano.

— Sufiĉe, — diris Petronio. — Mia parenco, Vinicio, al kiu mi oferis hodiaŭ matene Eŭnikon, ne akceptis ŝin, ŝi do restu en la domo. Ci povas foriri.

— Ĉu ci permesas al mi, sinjoro, paroli plu pri Eŭniko?

— Mi ordonis al ci diri ĉion, kion ci scias.

— La tuta domanaro, sinjoro, parolas pri la forkuro de la fraŭlino, kiu estis loĝonta en la domo de la nobla Vinicio. Post cia foriro Eŭniko venis al mi kaj diris, ke ŝi konas homon, kiu scios ŝin retrovi.

— Ha! — diris Petronio. — Kiu li estas?

— Mi ne konas lin, sinjoro, mi pensis tamen, ke estas mia devo komuniki al ci tion.

— Bone. Tiu homo atendu ĉi tie morgaŭ matene la alvenon de la tribunuso, kiun ci petos morgaŭ en mia nomo, ke li matene min vizitu.

La atriestro riverencis kaj eliris. Kaj Petronio komencis malgraŭvole pensi pri Eŭniko. Komence ŝajnis al li klara afero, ke la juna sklavino deziras, ke Vinicio reakiru Ligian, nur por ne devi mem anstataŭi ŝin en lia domo. Sed poste venis en lian kapon, ke la homo, kiun Eŭniko rekomendas, estas eble ŝia amanto, kaj tiu penso subite ekŝajnis al li malagrable. Ekzistis, vere, simpla rimedo por ekscii la veron, ĉar sufiĉis nur voki Eŭnikon, sed estis jam malfrua horo kaj Petronio sentis sin laca post la longa vizito ĉe Ĥrizotemiso; li sopiris dormon. Tamen, irante en la dormoĉambron, li ial rememoris, ke en la okulanguloj de Ĥrizotemiso li rimarkis hodiaŭ sulketojn. Li ekpensis

ankaŭ, ke ŝia beleco estas pli fama en la tuta Romo ol vera, kaj ke Fontejo Kapitono, kiu proponis al li tri knabetojn el Klazomenoj por Eŭniko, volis tamen aĉeti ŝin tro malkare.

## Ĉapitro 13<sup>a</sup>

Sekvatage Petronio apenaŭ estis finanta vesti sin en la *unktorio*, kiam venis Vinicio, vokita per Tirezio.

Li jam sciis, ke nenia novaĵo venis de la pordegoj, kaj tiu scio, anstataŭ ĝojigi lin kiel la pruvo, ke Ligia estas ankoraŭ en la urbo, ankoraŭ pli lin senkuraĝigis, ĉar li komencis supozi, ke eble Urso elkondukis ŝin el la urbo tuj post la forkapto, tio estas antaŭ ol la sklavoj de Petronio komencis gvati ĉe la pordegoj. En aŭtuno, vere, kiam la tagoj iĝadis pli mallongaj, oni fermadis ilin sufiĉe frue, sed oni ja malfermadis ilin por forveturantoj, kies nombro estis kelkfoje konsiderinte granda. Oni ankaŭ povis penetri ekster la murojn per aliaj manieroj, pri kiuj ekzemple sklavoj, volantaj forkuri el la urbo, bone sciis.

Cetere, Vinicio sendis siajn servistojn ankaŭ sur ĉiujn vojojn, kondukantaj en provincon, al *vigiloj* en malpli grandaj urboj, kun sciigoj pri forkurinta paro da sklavoj, kun preciza priskribo de Urso kaj Ligia kaj kun anonco pri rekompenco por ilia kapto. Estis tamen dube, ĉu tiu

postĉaso povos ilin atingi, kaj eĉ se ĝi atingus, ĉu la lokaj aŭtoritatuloj sentos sin rajtigitaj reteni ilin laŭ privata postulo de Vinicio, ne atestita de *pretoro*. Kaj por ricevi tiun ateston mankis tempo. Siaflanke Vinicio dum la tuta hieraŭa tago serĉis Ligian, alivestite kiel sklavo, en ĉiuj stratetoj de la urbo, li ne sukcesis tamen trovi eĉ plej etan postsignon aŭ indikon. Li vidis, vere, servistojn de Aŭlo, sed tio nur plikonfirmis lian opinion, ke ne Aŭlo ŝin forkaptis, kaj ke ili same ne scias, kie ŝi estas.

Kiam do Tirezio anoncis al li, ke estas homo, kiu entreprenas ŝin retrovi, li ekrapidegis en la domon de Petronio kaj, apenaŭ lin salutinte, komencis demandi pri tiu homo.

— Ni baldaŭ lin vidos, — diris Petronio. — Li estas konato de Eŭniko, kiu tuj venos por aranĝi la faldojn de mia togo, kaj kiu informos nin pri li pli precize.

— Eŭniko, tiu, kiun ci hieraŭ volis donaci al mi?

— Tiu, kiun ci malakceptis, pro kio cetere mi estas danka al ci, ĉar ŝi estas la plej bona vestofaldistino en la tuta urbo.

Efektive la vestofaldistino alvenis preskaŭ antaŭ ol li finis paroli, kaj preninte togon, kuŝantan sur eburinkrustita seĝo, dismetis ĝin por ĝin ĵeti sur la ŝultrojn de Petronio. Ŝia vizaĝo estis pala, trankvila, en ŝiaj okuloj brilis fe-



liĉo.

Petronio rigardis ŝin, kaj ŝi ekŝajnis al li tre bela. Post momento, kiam, volvinte la togon ĉirkaŭ li, ŝi komencis ĝin faldi, klinante sin por longigi la faldojn, li rimarkis, ke ŝiaj brakoj havas mirindan koloron de pala rozo, kaj la brusto kaj ŝultroj diafanajn nuancojn de perlamoto aŭ alabastro.

— Eŭniko, — li diris, — ĉu venis tiu homo, pri kiu ci parolis hieraŭ al Tirezio?

— Li venis, sinjoro.

— Kiel li nomas sin?

— Ĥilono Ĥilonido, sinjoro.

— Kio li estas?

— Kuracisto, saĝulo kaj aŭguristo, kiu scias antaŭlegi homajn sortojn kaj antaŭdiri estontecon.

— Ĉu li antaŭdiris la estontecon al ci?

— Jes, sinjoro.

— Kion li do aŭguris al ci?

— Ke trafos min doloro kaj feliĉo.

— La doloro trafis cin hieraŭ el la mano de Tirezio, devas do veni ankaŭ feliĉo.

— Ĝi jam venis, sinjoro.

— Kia?

Kaj ŝi ekflustris mallaŭte:

— Mi restis.

Petronio metis la manon sur ŝian oran kapon.

— Ci bone aranĝis hodiaŭ la faldojn, kaj mi estas kontenta de ci, Eŭniko.

Kaj ĉe tiu ektuŝo ŝiaj okuloj en unu momento vualigis per nebulo de feliĉo kaj la brusto komencis movi sin rapide.

Sed Petronio kaj Vinicio transiris en la atrion; tie atendis Ĥilono Ĥilonido, kiu, ekvidinte ilin, profunde riverencis. Sur la buŝo de Petronio, je la penso pri la hieraŭ farita supozo, ke tiu ĉi homo estas eble amanto de Eŭniko, aperis rideto. La homo, kiu staris antaŭ li, povis esti nenies amanto. En tiu stranga figuro estis io kune abomena kaj ridinda. Li ne estis maljuna: en lia malorda barbo kaj en la krispa hararo apenaŭ tie kaj ie trabilis griza fadeno. Li havis ventron kaviĝintan, kurbigitan dorson, tiel ke unuavide li ŝajnis esti ĝiba; super tiu ĝibo sin trovis granda kapo kun vizaĝo simia kaj samtempe vulpa, kun penetrema rigardo. Lia flaveta haŭto estis makulita de pustuloj, kaj la nazo, plene kovrita de ili, povis atesti tro grandan inklinon al drinko. Lia malzorgita vesto, konsistanta el malhela tuniko teksita el kapra lano kaj samtia truhava mantelo, estis pruvo pri vera aŭ ŝajnigata mizero.

Petronio ĉe lia vido rememoris la homeran Tersiton<sup>177</sup>,

respondante do per manklino al lia riverenco, li diris:

— Saluton, dia Tersito. Kiel fartas ciaj tuberoj, kiujn apud Trojo batis al ci Uliso, kaj kiel li mem pasigas la tempon sur la Kampoj Elizeaj?

— Nobla sinjoro, — respondis Ĥilono Ĥilonido, — la plej saĝa el la mortintoj, Uliso, sendas pere de mi al la plej saĝa el la vivantoj, Petronio, saluton kaj peton, ke li kovru per nova mantelo miajn tuberojn.

— Je Hekato Triforma! — ekkriis Petronio, — la respondo meritas mantelon.

Sed pluan interparolon interrompis la senpacienca Vinicio, kiu demandis rekte:

— Ĉu ci scias precize, kion ci entreprenas?

— Kiam du domanaroj en du brilaj domoj parolas pri nenio alia, kaj post ili la novaĵon ripetas duono da Romo, ne estas malfacile scii, — respondis Ĥilono. — Hieraŭ nokte oni forkaptis fraŭlinon, edukitan en la domo de Aŭlo Plaŭcio, nomatan Ligia, aŭ pli ĝuste Kallina, kiun ciaj sklavoĵoj, ho sinjoro, estis transkondukantaj el la imperiestra palaco en cian domon, kaj mi entreprenas trovi ŝin en la urbo, aŭ, se ŝi, kio estas malmulte verŝajna, forlasis la urbon, montri al ci, nobla sinjoro, kien ŝi forkuris kaj kie ŝi sin kaŝas.

<sup>177</sup> Greke Θερσίτης — en «Iliado», la plej malbela, malice babilema kaj aroganta el la grekoj sieĝantaj Trojon.

— Bone, — diris Vinicio, al kiu plaĉis la precizeco de la respondo, — kiajn rimedojn ci havas por tio?

Ĥilono ridetis ruze:

— La rimedojn havas ci, sinjoro; mi havas nur saĝon.

Ankaŭ Petronio ridetis, ĉar li estis tute kontenta de sia gasto.

«Tiu ĉi homo povas trovi la knabinon», li ekpensis.

Dume Vinicio sulkigis siajn kunkreskantajn brovojn kaj diris:

— Mizerulo, se ci min trompas por profito, mi igos cin morti sub bastonoj.

— Mi estas filozofo, sinjoro, kaj filozofo ne povas esti avida je profito, speciale je tia, kian ci grandanime promesas.

— Ha, ci estas filozofo? — demandis Petronio. — Eŭniko diris al mi, ke ci estas kuracisto kaj aŭguristo. De kie ci konas Eŭnikon?

— Ŝi venis al mi peti konsilon, ĉar mia gloro atingis ŝiajn orelojn.

— Kian konsilon ŝi volis?

— Kontraŭ amo, sinjoro. Ŝi volis esti kuracita de senreciproka amo.

— Ĉu ci kuracis ŝin?

— Mi faris pli, sinjoro, ĉar mi donis al ŝi amuleton, kiu

sekurigas reciprokecon. En Pafoso, sur Kipro, estas templo, sinjoro, kie oni konservas zoneton de Venero. Mi donis al ŝi du fadenojn el tiu zoneto, fermitajn en migdala ŝelo.

— Kaj ci igis ŝin multe pagi?

— Por reciprokeco oni neniam povas sufiĉe pagi, kaj mi, ne havante du fingrojn, ŝparas monon por aĉeti sklavon-skribiston, kiu kunskribados miajn pensojn kaj konservos mian scion por la mondo.

— Al kiu skolo ci apartenas, dia saĝulo?

— Mi estas cinikisto, sinjoro, ĉar mi havas truitan mantelon; mi estas stoikisto, ĉar mi elportas pacience mizeron; kaj mi estas peripatetiko<sup>178</sup>, ĉar, ne posedante portilon, mi piediras de vinejo al vinejo kaj envoje instruas tiujn, kiuj promesas pagi por la kruĉo.

— Kaj ĉe la kruĉo ci iĝas retoro.

— Heraklito diris: «ĉio fluas», kaj ĉu ci povas nei sinjoro, ke vino estas fluidaĵo?

— Li ankaŭ instruis, ke fajro estas dio, kaj tiu dio flamas sur cia nazo.

— La dia Diogeno el Apolonio instruis, ke la esenco de aĵoj estas la aero, kaj ju pli varma estas la aero, des pli

<sup>178</sup> T.e. aristotelano. Onidire la nomo *peripatetiko* (gr. περιπατητικός, «promenemulo») aludas la kutimon de Aristotelo instrui promene kun la disĉiploj.

perfektajn estaĵojn ĝi kreas, kaj el la plej varma naskiĝas la animoj de saĝuloj. Ĉar aŭtune venas malvarmo, *sekve* vera saĝulo devas varmigi sian animon — per vino. Ci ja ne povas nei, sinjoro, ke kruĉo eĉ da vinaĉo el apud Kapuo aŭ Telezio disportas varmon al ĉiuj ostoj de la pere-ema korpo homa.

— Ĥilono Ĥilonido, kie estas cia patrujo?

— Apud Pont-Eŭkseno. Mi devenas el Mezembrio.<sup>179</sup>

— Ĥilono Ĥilonido, ci estas granda!

— Kaj neaprezita! — melankolie aldonis la saĝulo.

Vinicio tamen denove senpacienciĝis. Al li ekbrilis la espero, li volus, ke Ĥilono tuj ekserĉu, kaj la tuta interparolo al li ŝajnis vana tempoperdo, pro kiu li koleris kontraŭ Petronio.

— Kiam ci komencos la serĉadon? — li diris, sin turnante al la greko.

— Mi jam ĝin komencis, — respondis Ĥilono. — Eĉ kiam mi estas ĉi tie, kiam mi respondas al ciaj afablaj demandoj, mi ankaŭ serĉas. Havu nur fidon, nobla tribunuso, kaj sciu, ke se ci perdus ligilon de ŝuo, mi scipovus trovi la ligilon, aŭ tiun, kiu sur strato ĝin levis.

— Ĉu antaŭe ci jam plemumis tiajn servojn? — demandis Petronio.

<sup>179</sup> **Pont-Eŭkseno** [NPiV] Antikva nomo de la Nigra Maro. **Mezembrio**, gr. Μεσημβρία — urbo en Tracujo, la nuna Bulgaria Несебър.

La greko suprenlevis la okulojn.

— Tro malalte oni taksas hodiaŭ virton kaj scion — tial filozofo estas devigata serĉi aliajn vivrimedojn.

— Kiaj estas la ciaj?

— Ĉion scii kaj servi per informoj al tiuj, kiuj ilin deziras.

— ... Kaj kiuj ilin pripagas, ĉu?

— Ha, sinjoro, mi bezonas aĉeti skribiston. Alie mia saĝeco mortos kun mi.

— Se ci ne ŝparis ĝis nun eĉ por sentrua mantelo, ciaj meritoj verŝajne ne estas eminentaj.

— Modesteco malpermesas al mi glori ilin. Sed pripensu, sinjoro, ke hodiaŭ ne plu ekzistas tiaj bonfarantoj, kiaj grandnombre ekzistis antaŭe, kaj al kiuj surŝuti per oro meriton estis tiel agrable, kiel gluti ostron el Puteolo. Ne miaj meritoj estas malgrandaj, sed la homa dankemo estas malgranda. Ifoje, se forkuras altvalora sklavo, kiu lin retrovas, se ne la sola filo de mia patro? Se sur la muroj aperas surskriboj kontraŭ la dia Popea, kiu malkovras la aŭtorojn? Kiu elserĉas ĉe librovendistoj versaĵon kontraŭ la imperiestro? Kiu konigas, kion oni parolis en la domoj de senatanoj kaj kavaliroj? Kiu portas leterojn, kiujn oni ne volas konfidi al sklavoj; kiu aŭskultas novaĵojn ĉe la pordoj de barbiroj; antaŭ kiu ne havas sekretojn vinvend-

istoj kaj bakistoj; al kiu fidas sklavoj; kiu scipovas travidi ĉiun domon de la atrio ĝis la ĝardeno? Kiu konas ĉiujn stratojn, vojetojn, kaŝejojn; kiu scias, kion oni parolas en vaporbanejoj, en cirkoj, sur foirplacoj, en lernejoj de skermistoj, en budoj de sklavvendistoj kaj eĉ en la sablofosejoj<sup>180</sup>?

— Je dioj! Sufiĉe, nobla saĝulo! — ekkriis Petronio, — aŭ ni dronos en ciaj meritoj, virto, saĝeco kaj elokventeco. Sufiĉe! Ni volis scii, kiu ci estas, kaj nun ni scias.

Sed Vinicio estis kontenta, ĉar li ekpensis, ke tiu ĉi homo, simile al ĉashundo, foje kurigita post ĉasaĵo, ne haltos, antaŭ ol li trovos ĝian kaŝejon.

— Bone, — li diris, — ĉu ci bezonas indikojn?

— Mi bezonas armilon.

— Kian? — demandis Vinicio kun miro.

La greko etendis unu manon kaj per la alia faris la geston de monkalkulo.

— Tia tempo nun estas, sinjoro, — li diris kun sopiro.

— Ci estos do azeno, — diris Petronio, — kiu konkeras fortikaĵon per sakoj da oro.

— Mi estas nur malriĉa filozofo, sinjoro, — humile respondis Ĥilono, — la oron havas vi.

Vinicio ĵetis al li saketon, kiun la greko kaptis en la

<sup>180</sup> Latine *arenaria*, foŝejoj de kie oni prenis sablon.



aero, kvankam efektive li ne havis du fingrojn ĉe la dekstra mano. Poste li levis la kapon kaj diris:

— Sinjoro, mi jam scias pli multe ol ci esperas. Mi ne venis ĉi tien kun malplenaj manoj. Mi scias, ke la fraŭlinon ne forkaptis Aŭlo, ĉar mi parolis jam kun iliaj servistoj. Mi scias, ke ŝi ne estas sur Palatino, kie ĉiuj estas okupitaj per la malsano de la malgranda aŭgustino, kaj eble mi eĉ divenas, kial vi preferas serĉi la fraŭlinon kun mia helpo ol kun la helpo de la *vigiloj* kaj imperiestraj soldatoj. Mi scias, ke la forkuron faciligis al ŝi servisto, devenanta el la sama lando kiel ŝi. Li ne povis trovi helpon ĉe sklavoj, ĉar sklavoj, kiuj staras unuj kun aliaj, ne helpus al li kontraŭ la ciaj. Povis nur helpi al li samkonfesantoj.

— Aŭskultu, Vinicio, — interrompis Petronio, — ĉu mi ne diris al ci la samon, vorton post vorto?

— Tio estas honoro por mi, — diris Hîlono. — La fraŭlino, sinjoro, — li diris, denove sin turnante al Vinicio, — sendube konfesas saman dion kun la plej nobla el la romaninoj, tiu vera *matrona stolata*,<sup>181</sup> Pomponia. Mi aŭdis ankaŭ, ke Pomponia estis hejme juĝita pro konfesado de iuj fremdaj dioj, sed mi ne povis ekscii de ŝiaj servistoj, kiu dio tio estas kaj kiel nomas sin liaj konfesantoj. Se mi povus tion scii, mi irus al ili, iĝus la plej pia inter ili kaj

<sup>181</sup> *matrona stolata* (lat.) — edzino, hejmestrino en vesto de edziniĝinta nobelino.

akirus ilian fidon. Sed ci, sinjoro, kiu, kiel mi ankaŭ scias, pasigis dekkelkajn tagojn en la domo de la nobla Aŭlo, eble povas doni al mi pri tio ian informon?

— Mi ne povas, — diris Vinicio.

— Vi longe min demandis pri diversaj aferoj, noblaj sinjoroj, kaj mi respondis la demandojn; permesu nun ke mi vin demandu. Ĉu ci vidis, nobla tribunuso, iajn statuetojn, iajn oferojn, iajn signojn, iajn amuletojn sur Pomponia aŭ sur cia dia Ligia? Ĉu ci vidis, ke ili eble desegnis inter si iajn signojn, kompreneblajn sole por ili?

— Signojn? Atentu. Jes! Mi vidis foje, kiel Ligia desegnis fiŝon sur sablo.

— Fiŝon? Haa! Hoo! Ĉu ŝi faris tion unu fojon, aŭ kelkfoje?

— Unu fojon.

— Kaj ĉu ci certas, sinjoro, ke ŝi desegnis fiŝon? Hoo!

— Jes! — respondis Vinicio interese. — Ĉu ci divenas, kion ĝi signifas?

— Ĉu mi divenas?! — ekkriis Ĥilono.

Kaj riverencinte signe de adiaŭo, li aldonis:

— Fortuno egale ŝutu sur vin ambaŭ ĉiajn donacojn, noblaj sinjoroj.

— Oni donu al ci mantelon! — diris Petronio al la foriranto.

— Uliso esprimas al ci dankojn pro Tersito, — respondis la greko.

Kaj, riverencinte refoje, li eliris.

— Kion ci diras pri tiu nobla saĝulo? — demandis Vinnicion Petronio.

— Mi diras, ke li trovos Ligian! — ĝoje ekkriis Vinnicio, — sed mi ankaŭ diras, ke se ekzistus regno de friponoj, li povus esti tiesĉ reĝo.

— Sendube. Mi devas konatiĝi pli proksime kun tiu stoikisto, sed dume mi ordonos incensi post li la atrion.

Hilono Hilonido, volvinte ĉirkaŭ si la novan mantelon, ĵetludis sub ĝiaj faldoj per la monujo ricevita de Vinnicio, kaj ĝuis samtiel ĝian pezon, kiel la sonon. Irante malrapide kaj rigardante malantaŭen, ĉu oni lin observas el la domo de Petronio, li preterpasis la portikon de Livia kaj, atinginte la angulon de Deklivo Virbia, sin direktis al Suburo.

«Mi devas iri al Sporo, — li diris al si mem, — kaj verŝiom da vino al Fortuno. Fine mi trovis tion, kion mi de longe serĉis. Li estas juna, flamiĝema, malavara kiel la minejoj de Kipro, kaj por tiu ligia kanabenino<sup>182</sup> pretus fordoni duonon da sia havaĵo. Jes, ĝuste tian homon mi serĉ-

<sup>182</sup> **kanaben<sup>2</sup>o** — Specio de kardelo, birdeto kun malhele ruĝa brusto.

is delonge. Sed mi estu singarda kun li, ĉar tiu lia sulkigo de la brovoj antaŭdiras nenion bonan. Aĥ, la lupidoj<sup>183</sup> regas hodiaŭ la mondon! Malpli mi timus tiun Petronion. Ho dioj! Kial parigado estas hodiaŭ pli pagata ol virto? Ha, ŝi desegnis al ci fiŝon sur sablo? Se mi scias, kion ĝi signifas, mi sufokiĝu per peco da kaprina fromaĝo! Sed mi scios! Ĉar tamen la fiŝoj vivas en akvo, kaj serĉado en la akvo estas pli malfacila ol sur la tero, *sekve*: li pagos al mi por ĉiu fiŝo aparte. Ankoraŭ unu tia monujo — kaj mi povos forĵeti la almozulan sakon kaj aĉeti sklavon. Sed kion ci dirus, Ĥilono, se mi konsilus al ci aĉeti ne sklavon, sed sklavinon? Mi konas cin! Mi scias, ke ci konsentos! Se ŝi estus bela kiel, ekzemple, Eŭniko, ci mem rejuniĝus ĉe ŝi, kaj samtempe ci havus de ŝi honestan kaj certan profiton. Mi vendis al tiu kompatinda Eŭniko du fadenojn el mia propra malnova mantelo ... Ŝi estas malsaĝa, sed se Petronio ŝin donacus al mi, mi ŝin prenis ... Jes, jes, Ĥilono, ido de Ĥilono ... Ci perdis la patron kaj la patrinon ... Ci estas orfo, do konsolu cin almenaŭ, aĉetante sklavinon. Ŝi devas, vere, ie loĝi, do Vinicio luos por ŝi loĝejon? Kie ankaŭ ci trovos rifuĝon; ŝi devas sin vesti, do Vinicio pagos por ŝia vesto, kaj ŝi devas manĝi, do li ŝin nutros. Ho, kiel malfacila estas la vivo! Kie estas la tempo, kiam por

<sup>183</sup> T.e. romanoj; laŭ legendo, la fondintojn de Romo, Romulon kaj Remon, mamnutris lupino.

obolo oni povis ricevi tiom da faboj kun lardo, kiom oni povis teni en ambaŭ manoj, aŭ pecon da kaprina kolbaso, saturita je sango, longan, kiel brako de dekdujara knabo! Sed jen tiu ŝtelisto, Sporo! En vinejo estos plej facile ion ekscii.»

Tiel parolante, li eniris la vinejon, kie li mendis por si kruĉon da malhela vino; vidante senfidan rigardon de la mastro, li elskrapis oran moneron el la monujo kaj metinte ĝin sur la tablon, diris:

— Sporo, mi laboris hodiaŭ kun Seneko de la frumate-no ĝis la tagmezo, kaj jen kion mia amiko donacis al mi ĉe la adiaŭo.

La rondaj okuloj de Sporo ĉe tiu vido iĝis ankoraŭ pli rondaj, kaj antaŭ Ĥilono tuj aperis la vino; Ĥilono, trempinte en ĝi la fingron, desegnis sur la tablo fiŝon kaj diris:

— Ĉu ci scias, kion ĝi signifas?

— Fiŝo? Nu, fiŝo estas fiŝo.

— Malsaĝa ci estas, kvankam ci alverŝas tiom da akvo al la vino, ke povus tie troviĝi eĉ fiŝo. Tio estas simbolo, kiu en la lingvo de la filozofoj signifas: rideto de Fortuno. Se ci ĝin divenus, eble ankaŭ al ci ridetus Fortuno. Respektu filozofion, mi diras al ci, aŭ mi translokiĝos en alian vinejon, kion mia persona amiko Petronio delonge al mi konsilas.

## Ĉapitro 14<sup>a</sup>

Dum kelkaj sekvintaj tagoj Ĥilono nenie sin montris. Vinicio, kiu, de kiam li eksciis de Akteo, ke Ligia lin amis, centoble pli deziris ŝin retrovi, komencis mem serĉi ŝin, ne volante, kaj ankaŭ ne povante peti helpon de la imperiestro, konsumata de maltrankvilo pro la malsano de la malgranda aŭgustino.

Senefikaj restis fine la oferoj, farataj en temploj, la preĝoj kaj la votoj, same kiel la kuracista arto kaj ĉiaj sorĉaj rimedoj, kiujn oni aplikis en la ekstrema malespero. Post semajno la infano mortis. Funebro kovris la kortegon kaj Romon. Nerono, kiu post la naskiĝo de la infano frenezis de feliĉo, nun frenezis de malespero; ferminte sin en siaj ĉambroj, dum du tagoj li akceptis nenian nutraĵon, kaj kvankam en la palaco svarmis amasoj da senatanoj kaj aŭgustanoj, kiuj rapidis tien kun signoj de bedaŭro kaj kunsento, neniun li volis vidi. La senato en eksterordinara kunsido proklamis la mortintan infanon diino; oni decidis konstrui al ŝi templon kaj nomumi por ĝi apartan pastron. Ankaŭ en aliaj temploj oni faris novajn oferdonojn honore al la mortintino, oni gisis ŝiajn statuojn el multekostaj metaloj, kaj la enterigo estis unu senmezura soleno, dum kiu la popolo admiris la malmoderajn signojn de funebro,

kiujn elmontradis Nerono, ploris kun li, etendadis la manojn por donacoj, kaj, super ĉio, sin amuzis per la eksterordinara spektaklo.

Petronion maltrankviligis tiu morto. Oni sciis jam en la tuta Romo, ke Popea ĝin atribuas al sorĉo. Post ŝi ripetis tion ankaŭ la kuracistoj, kiuj tiumaniere povis pravigi la senefikecon de siaj penoj, kaj la pastroj, kies oferdonoj montriĝis senhelpaj, kaj la sorĉofaristoj, tremantaj pri sia vivo, kaj la popolo. Petronio estis nun kontenta, ke Ligia forkuris; ĉar tamen li ne deziris malbonon al Aŭlo, kaj deziris bonon al si mem kaj al Vinicio, tial, kiam oni forigis la cipreson, fiksitan signe de funebro antaŭ Palatino, li iris al akcepto, aranĝita por la senatanoj kaj aŭgustanoj, volante konvinkiĝi, kiagrade Nerono inklinas kredi la famojn pri sorĉo, kaj kontraŭagi sekvojn, kiuj povus el tio rezulti.

Konante Neronon, li ankaŭ supozis ke tiu, eĉ se li ne ekkredis je sorĉo, ŝajnigos tamen ke li kredas, tiel por trompi sian doloron, kiel por venĝi kontraŭ iu ajn, kaj fine por kontraŭagi supozojn, ke la dioj komencas lin puni por liaj krimoj. Petronio ne kredis, ke Nerono povis ami eĉ la propran infanon vere kaj profunde; kvankam Nerono amis ĝin flame, tamen Petronio certis, ke la imperiestro troafektos la doloron. Li ne eraris, vere. Nerono aŭskultis konsolojn de senatanoj kaj kavaliroj kun ŝtona

vizaĝo, kun okuloj fiksitaj sur unu punkto, kaj oni vidis, ke eĉ se li efektive suferas, li tamen samtempe pensas pri tio, kiel lia doloro impresas la ĉeestantojn; li samtempe pozas je Niobo<sup>184</sup> kaj faras spektaklon de patra funebro, kiel ĝin farus aktoro sur scenejo. Li eĉ ne sciis ĉe tio persisti en la silenta kaj kvazaŭ ŝtonrigida doloro, ĉar iafoje li faris gestojn, kvazaŭ li ŝutus sur la kapon polvon de la tero, iafoje ĝemis obtuze, kaj ekvidinte Petronion, levis sin subite kaj per tragedia voĉo komencis paroli tiel, ke ĉiuj povu lin aŭdi:

— Ho ve! Ankaŭ ci kulpas pri ŝia morto! Laŭ cia konsilo eniris inter tiujn ĉi murojn la malbona spirito, kiu per unu rigardo elsuĉis la vivon el ŝia brusto ... Ve al mi! Kaj prefere miaj okuloj ne estus vidintaj la lumon de Helioso ... Ve al mi! Ho ve! Ho ve!

Kaj laŭtigante ĉiam pli la voĉon, li ŝanĝis ĝin en malesperan krion, sed Petronio en tiu sama momento decidis riski ĉion per unu ĵeto de kubo; etendinte la manon, li deŝiris rapide la silkan tukon, kiun Nerono ĉiam portis ĉirkaŭ la kolo, kaj metis ĝin sur lian buŝon.

— Sinjoro! — li diris gravatone, — bruligu Romon kaj la mondon pro doloro, sed konservu al ni cian voĉon!

Ekmiregis la ĉeestantoj, ekmiregis momente Nerono

<sup>184</sup> **Niobo** [NPIV] gr. Νιόβη — (mit.) Filino de Tantalo, naskinta 14 gefilojn, ĉiujn sagmortigitajn de Apolono.



mem, nur Petronio sola restis neŝancelita. Li sciis treege bone, kion li faras. Li ja memoris, ke al Terpno kaj Diodoro estis ordonite simple kovri la buŝon de Nerono, se li, laŭtigante la voĉon, ĝin elmetus al ia ajn danĝero.

— Cezaro, — li parolis plu kun tiu sama graveco kaj malgajeco, — ni suferis grandegan perdon, restu al ni almenaŭ ĉi tiu konsola trezoro!

La vizaĝo de Nerono ekstremis kaj post momento lar-  
moj ekfluis el liaj okuloj, subite li apogis la manojn sur la ŝultrojn de Petronio kaj, metinte la kapon sur lian bruston, komencis ripeti meze de plorĝemoj:

— Ci sola el ĉiuj pri tio ekpensis, ci sola, Petronio! Ci sola!

Tigeleno flaviĝis pro ĵaluzo — kaj Petronio diris plu:

— Veturu Ancion! Tie ŝi venis en la mondon, tie venis sur cin ĝojo, tie venos konsolo. La mara aero refreŝigos cian dian gorĝon; cia brusto spiros la salan malsekecon. Ni, ciaj fideluloj, sekvos cin ĉien, kaj dum ni konsolos cian doloron per amikeco, ci nin konsolos per kanto.

— Jes! — diris Nerono per plenda voĉo, — mi verkos himnon je ŝia honoro kaj komponos al ĝi muzikon.

— Kaj poste ci serĉos la varman sunon en Bajo.

— Kaj poste, forgeson en Grekujo.

— En la patrujo de poezio kaj kanto!

Tiel la ŝtona, malserena atmosfero pasis iom post iom, kiel pasas nuboj, kovrantaj la sunon, kaj komenciĝis interparolo, ankoraŭ kvazaŭ plena je malĝojo, sed plena ankaŭ je projektoj por la estonteco, koncernantaj la vojaĝon, artistajn prezentiĝojn, kaj eĉ akceptojn, kiujn postulis anoncita vizito de Tiridato, la reĝo de Armenujo. Tigeleno, vere, provis ankoraŭ mencii pri la sorĉo, sed Petronio, jam certa pri sia venko, volonte akceptis la defion.

— Tigeleno, — li diris, — ĉu ci kredas, ke sorĉo povas malutili al dioj?

— Cezaro mem parolis pri ili, — respondis la kortegano.

— Doloro parolis, ne Cezaro, sed kion ci opinias pri tio?

— Dioj estas tro potencaj por esti trafataj de sorĉo.

— Ĉu ci do malkonfesas la diecon de Cezaro kaj de lia familio?

— *Peractum est!* — ekmurmuris Eprio Marcelo, staranta apud Petronio, uzante la ekkrion eligatan de la popolo kiam gladiatoro sur la areno estas trafita tiel ke ne necesas lin finmortigi.

Tigeleno subpremis en si koleron. Li kaj Petronio de longe estis rivaloj antaŭ la imperiestro, kaj Tigeleno havis tiun superecon, ke Nerono malpli, aŭ, pli ĝuste, tute

ne ĝenis sin en lia ĉeesto; ĝis tiam tamen Petronio venkis lin en ĉiu kunpuŝiĝo per sia saĝeco aŭ spriteco.

Tiel okazis ankaŭ ĉi-foje. Tigeleno eksilentis, kaj nur enskribis en sian memoron tiujn senatanojn kaj kavalirojn, kiuj en la momento, kiam Petronio repaŝis en la fundon de la ĉambrego, grupiĝis ĉirkaŭ li, opiniante ke post tio, kio okazis, li estos nepre la unua favorato de la imperiestro.

Forlasinte la palacon, Petronio iris al Vinicio, rakontis al li la epizodon kun la imperiestro kaj Tigeleno kaj diris:

— Ne nur mi forturnis la danĝeron de Aŭlo Plaŭcio kaj Pomponia, kaj kune de ni ambaŭ, sed ankaŭ de Ligia, kiun oni ne serĉos simple tial, ke mi persvadis al la ku-probarba simio veturi en Ancion, kaj el tie en Neapolon aŭ Bajon. Li veturos, ĉar en Romo li ĝis nun ne kuraĝis prezentiĝi publike en teatro, kaj mi scias, ke delonge li jam intencas prezentiĝi en Neapolo. Por poste li revas pri Grekujo, kie li volas kanti en ĉiuj iom gravaj urboj, kaj poste, kune kun ĉiuj laŭrokronoj, kiujn oferos al li la *Græculi*<sup>185</sup>, soleni triumfan enveturon en Romon. Dum tiu tempo ni povos libere serĉi Ligian kaj kaŝi ŝin en sekura loko. Kaj nia nobla filozofa? Ĉu li ne venis ĝis nun?

— Cia nobla filozofa estas trompisto. Li ne venis, sin

<sup>185</sup> *Græculi* [grekuli] (lat.) — grekoj (malestime).

ne prezentis kaj neniam prezentos!

— Mi tamen havas pli bonan opinion, ne tiom eble pri lia honesteco, kiom pri lia saĝeco. Li fluigis jam iom da sango el cia monsako kaj venos almenaŭ por fluigi ĝin duafoje.

— Li sin gardu, ke mi ne fluigu lian sangon!

— Ne faru tion; havu kun li paciencon, ĝis ci konvinkigos per pruvoj pri lia trompo. Ne donu al li pli da mono, sed promesu anstataŭe malavaran rekompencan, se li alportos al ci sciigon certan. Ĉu ankaŭ ci mem ion entreprenas?

— Du miaj liberigitoj, Nimfidio kaj Demaso, serĉas ŝin kun sesdek homoj. Al tiu el la sklavoj, kiu ŝin trovos, mi promesis liberecon. Mi sendis krom tio kurierojn sur ĉiujn vojojn kondukantaj al Romo, ke ili demandu en gastejoj pri la ligio kaj pri la fraŭlino. Mi mem trakuras la urbon tage kaj nokte, esperante feliĉan hazardon.

— Kion ajn ci scios, konigu al mi, ĉar mi devas veturi en Ancion.

— Bone.

— Kaj se iun matenon, vekiĝinte, ci diros al ci, ke pro unu knabino ne valoras sin aflikti kaj fari pro ŝi tiom da klopodoj, tiam venu Ancion. Tie mankos nek virinoj, nek ĝuoj.

Vinicio komencis marŝi per rapidaj paŝoj, kaj Petronio sekvis lin dum kelka tempo per rigardo, fine li ekparolis:

— Diru al mi sincere, ne kiel brulkapulo, kiu ion trudas al si kaj mem sin ekscitas, sed kiel homo prudenta, kiu respondas al sia amiko: ĉu ĉiam egale ci deziras tiun Ligan?

Vinicio haltis por momento kaj rigardis tiel Petronion, kvazaŭ li antaŭe lin ne vidus, poste komencis denove marŝi. Videble estis, ke li subpremas en si eksplodon. Fine en liaj okuloj, pro la sento de sia senhelpeco, pro doloro, kolero kaj nevenkebla sopiro, ŝvelis du larmoj, kiuj ekparolis al Petronio pli konvinke ol plej elokventaj vortoj.

Do, enpenŝiginte por momento, li diris:

— La mondon portas sur la ŝultroj ne Atlaso, sed virino, kaj iafoje ludas per ĝi, kiel per pilko.

— Jes, — diris Vinicio.

Kaj ili komencis adiaŭi unu la alian. Sed en la sama momento sklavo sciigis, ke Hilonio Hilonido atendas en la vestiblo kaj petas, ke oni lin allasu antaŭ la vizaĝon de la mastro.

Vinicio ordonis lin tuj enlasi, kaj Petronio diris:

— Ha, ĉu mi ne diris al ci! Je Herkulo! Nur restu trankvila, alie li ekregos cin, ne ci lin.

— Saluton kaj honoron al la nobla armea tribunuso

kaj al ci, sinjoro! — parolis Ĥilono enirante. — Estu via feliĉo egala al via gloro kaj la gloro vastiĝu tra la tuta mondo, de la kolonoj de Herkulo ĝis la limoj de la Arŝakidoj<sup>186</sup>

— Saluton, proklamanto de leĝoj de virto kaj saĝeco! — respondis Petronio.

Sed Vinicio demandis kun ŝajna trankvilo:

— Kion ci alportas?

— La unuan fojon mi alportis al ci, sinjoro, esperon; nun mi alportas certecon, ke la fraŭlino estos retrovita.

— Tio signifas, ke ĝis nun ci ŝin ne trovis.

— Jes, sinjoro, sed mi trovis, kion signifas la signo, kiun ŝi faris al ci: mi scias, kiuj estas la homoj, kiuj ŝin forkaptis, kaj mi scias, inter konfesantoj de kiu dio oni devas ŝin serĉi.

Vinicio volis saltleviĝi de la seĝo, sur kiu li sidis, sed Petronio metis la manon sur lian ŝultron kaj, turnante sin al Ĥilono, diris:

— Parolu plu!

— Ĉu ci estas tute certa, sinjoro, ke la fraŭlino desegniĝis al ci fiŝon sur la sablo?

— Jes! — eksplodis Vinicio.

— Sekve ŝi estas kristanino kaj forkaptis ŝin kristanoj.

<sup>186</sup> **Arŝakidoj** — Partuja dinastio.

Venis momento de silento.

— Aŭskultu, Ĥilono, — diris fine Petronio. — Mia parenco promesis al ci grandan sumon da mono por retrovo de la fraŭlino, sed ne malpli grandan nombron da batoj, se ci volos lin trompi. En la unua okazo ci aĉetos ne unu, sed tri skribistojn, en la dua la filozofio de ĉiuj sep saĝuloj, plus cia propra, ne taŭgos por balzami ciajn vundojn.

— La fraŭlino estas kristanino, sinjoro! — ekkriis la greko.

— Pripensu iom, Ĥilono. Ci ne estas malsaĝulo! Ni scias, ke Junia Silana kaj Kalvia Krispinilla akuzis Pomponian Grecinan pri konfesado de la kristana superstiĉaro, sed ni scias ankaŭ, ke la hejma tribunalo liberigis ŝin de tiu akuzo. Ĉu do ci volus denove ĝin ripeti? Ĉu ci volus kredi al ni, ke Pomponia, kaj kune kun ŝi Ligia, povas aparteni al malamikoj de la homa gento, al venenistoj de fontanoj kaj putoj, al adorantoj de azenkapo, al homoj, kiuj murdas infanojn kaj malĉastas en plej senhonta maniero? Pensu, Ĥilono, ĉu la tezo, kiun ci proklamas al ni, ne anti-teziĝos per batoj sur cia dorso?

Ĥilono dismetis la manojn, signe ke tio ne estas lia kulpo, poste respondis:

— Sinjoro! Diru greke la sekvantan frazon: Jesuo Kristo, Filo de Dio, Savinto<sup>187</sup>.

— Bone. Jen mi diras. Kio do?

— Kaj nun prenu la unuajn literojn de ĉiu el tiuj ĉi vortoj kaj kunmetu ilin tiel, ke ili formu unu vorton.

— Fiŝo! — diris kun miro Petronio.

— Jen kial fiŝo iĝis la emblemo de la kristanoj, — respondis fiere Ĥilono.

Sekvis momento da silento. En la argumentoj de la greko estis tamen io tiel frapanta, ke la du amikoj ne povis kontraŭstari al miro.

— Vinicio, — demandis Petronio, — ĉu ci ne eraras kaj ĉu vere Ligia desegnis al ci fiŝon?

— Je ĉiuj subteraj dioj, oni povas freneziĝi! — ekkriis kun ekscito la juna viro, — se ŝi desegnus al mi birdon, mi dirus, ke ĝi estis birdo!

— Sekve ŝi estas kristanino! — ripetis Ĥilono.

— Tio signifas, — diris Petronio, — ke Pomponia kaj Ligia venenas putojn, murdas infanojn kaptitajn sur strat-oj, kaj malĉastas! Sensencaĵo! Ci, Vinicio, estis pli longe en ilia domo, mi estis mallonge, sed mi konas sufiĉe tiel Aŭlon kiel Pomponian, mi konas eĉ sufiĉe Ligian por diri: kalumnio kaj sensencaĵo! Se fiŝo estas vere la emblemo de la kristanoj, kion oni efektive ne povas nei, kaj se ili estas kristaninoj, tiam, je Prozerpino! eble la kristanoj ne estas

<sup>187</sup> Greke Ἰησοῦς Χριστός Θεοῦ Υἱὸς Σωτήρ → akronime ΙΧΘΥΣ (ΙἸΤΙΣ), kio estas la greka vorto por «fiŝo».



tiaj, kiaj ni opinias ilin.

— Ci parolas, kiel Sokrato, sinjoro, — respondis Ĥilono. — Kiu iam esploris kristanon? Kiu ekkonis ilian instruon? Kiam mi migris antaŭ tri jaroj el Neapolo al Romo (ho, kial mi ne restis tie!), aliĝis al mi homo, kuracisto nomata Glaŭko, pri kiu oni rakontis, ke li estis kristano, kaj malgraŭ tio mi konvinkiĝis, ke li estis bona kaj virta homo.

— Ĉu ne de tiu virta homo ci eksciis nun, kion signifas la fiŝo?

— Ne, sinjoro, bedaŭrinde! Envoje en unu gastejo iu frapis per ponardo la bonan maljunulon; lian edzinon kaj infanojn forkaptis sklavkomercistoj, kaj mi, defendante ilin, perdis ĉi tiujn du fingrojn. Ĉar tamen inter la kristanoj, kiel oni diras, ne mankas mirakloj, mi esperas, ke ili rekreskos.

— Kiel do? Ĉu ci iĝis kristano?

— De hieraŭ, sinjoro! De hieraŭ! Tiu fiŝo min kristanigis. Vidu, kia forto tamen estas en ĝi! Kaj post kelkaj tagoj mi estos la plej fervora el fervoraj por ke ili allasu min al ĉiuj siaj sekretoj, kaj kiam ili allasos min al ĉiuj sekretoj, mi ekscios, kie sin kaŝas la fraŭlino. Tiam eble mia kristaneco estos por mi pli profitodona ol mia filozofio. Mi ankaŭ faris voton al Merkuro, ke se li helpos al mi trovi la

forkurintojn, mi oferos al li du bovidinojn, egalajn laŭ aĝo kaj kresko, al kiuj mi ordonos orumi la kornojn.

— Do cia hieraŭa kristaneco kaj cia antaŭa filozofio ne malpermesas al ci kredi je Merkuro?

— Mi ĉiam kredas tion, kion mi bezonas kredi, kaj tio estas mia filozofio, kiu devus plaĉi speciale al Merkuro. Malfeliĉe, vi scias, noblaj sinjoroj, kiom suspektema dio li estas. Li ne kredas al promesoj eĉ de senmakulaj filozofoj kaj preferus eble antaŭe ricevi la bovidinojn; sed tio ja estas grandega elspezo. Ne ĉiu ja estas Seneko, kaj la elspezo ne estas por mi ebla, se tamen la nobla Vinicio bonvolus, antaŭpage por la sumo, kiun li al mi promesis iom...

— Eĉ ne unu obolon, Ĥilono! — diris Petronio, — eĉ ne unu obolon! La malavareco de Vinicio superos ciajn esprojn, sed nur tiam, kiam Ligia estos trovita, tio estas, kiam ci montros al ni ŝian kaŝejon. Merkuro devas krediti al ci la du bovidinojn, kvankam mi ne miras, ke li ne emas tion fari, kaj en ĉi tio mi rekonas lian saĝecon.

— Aŭskultu min, noblaj sinjoroj. La malkovro, kiun mi faris, estas grandega, ĉar kvankam mi ne trovis ĝis nun la fraŭlinon, mi trovis la vojon, sur kiu oni devas ŝin serĉi. Jen vi dissendis liberigitojn kaj sklavojn tra la tuta urbo kaj en la provincon — ĉu iu el ili havigis al vi ian indikon? Ne! Mi sola ĝin donis. Kaj mi diros al vi pli. Inter

viaj sklavoj povas esti kristanoj, pri kiuj vi ne scias, ĉar tiu superstiĉaro disvastiĝis jam ĉie, kaj tiuj, anstataŭ helpi, vin perfidos. Malbone eĉ estas, ke ili nun vidas min ĉi tie; tial ci, nobla Petronio, ordonu al Eŭniko silenti; kaj ci, same nobla Vinicio, diskonigu, ke mi vendas al ci ŝmir-aĵon, kiu al ĉevaloj ŝmiritaj per ĝi certigas venkon en cirko ... Mi sola serĉos, kaj mi sola retrovos la fraŭlinon; vi nur fidu al mi kaj sciu, ke kiom ajn mi ricevos antaŭe, ĝi estos por mi nur stimulo, ĉar ĉiam mi esperos ion pli kaj havos tiom pli grandan certecon, ke la promesita rekompenco ne restos preter mi. Ha, jes! Kiel filozofo mi malŝatas monon, kvankam malŝatas ĝin nek Seneko, nek Muzonio — kiuj tamen ne perdis fingrojn defendante iun, kaj kiuj povas mem skribi kaj transdoni siajn nomojn al la posteularo. Sed krom la sklavo, kiun mi intencas aĉeti, kaj krom Merkuro, al kiu mi promesis du bovidinojn (vi ja scias, kiel altiĝis la prezoj de brutoj), la serĉado mem sekvigas multegajn elspezojn. Aŭskultu nur pacience. Jen, dum tiuj kelkaj tagoj miaj piedoj kovriĝis per vundoj pro la senĉesa irado. Mi vizitadis vinejojn por babili kun homoj, mi vizitadis bakistojn, buĉistojn, vendistojn de olivoleo kaj fiŝkaptistojn. Mi trakuradis ĉiujn stratojn kaj stratetojn; mi estis en kaŝejoj de forkurintaj sklavoj; mi malgajnis pli ol cent asojn en morao-ludo; mi estis en lavejoj, se-

kigejoj, manĝejoj, mi vidis muelistojn kaj skulptistojn; mi vidis homojn, kiuj kuracas vezikon kaj elŝiras dentojn, mi parolis kun strataj vendistoj de sekigitaj figoj, mi estis en tombejoj, kaj ĉu vi scias por kio? Jen, por ĉie desegni la fiŝon, rigardi homojn en la okulojn kaj aŭskulti, kion ili respondos al tiu signo. Dum longa tempo mi povis nenion rimarki, fine mi ekvidis foje ĉe fontano maljunan sklavon, kiu ĉerpis akvon per siteloj kaj ploris. Proksimiĝinte tiam, mi demandis pri la kaŭzo de liaj larmoj. Al tio, kiam ni sidigis sur la ŝtupoj de la fontano, li respondis, ke dum la tuta vivo li ŝparis sestercon post sesterco por elaĉeti sian amatan filon, sed lia mastro, iu Pansa, ekvidinte la monon, ĝin forprenis, kaj la filon plu retenas kiel sklavon. «Kaj tial mi ploras», — parolis la maljunulo, — «ĉar kvankam mi ripetas: „fariĝu la dia volo“, mi ne povas, mizera pekulo, reteni la larmojn.» Tiam, kvazaŭ tuŝite de antaŭsento, mi desegnis al li fiŝon, kaj li respondis: «Ankaŭ mia espero estas en Kristo.» Mi do demandis: «Ci ekkonis min laŭ la signo?» Li diris: «Jes, kaj paco estu kun ci.» Tiam mi ektiris lin je la lango, kaj la bonulo ĉion elbabilis. Lia mastro, tiu Pansa, estas mem liberigito de la granda Pansa kaj venigas sur Tibero en Romon ŝtonojn, kiujn sklavoj kaj dungitoj elŝarĝas el flosoj kaj portas al konstruataj domoj nokte por ne bari la stratan movadon. Inter ili laboras

multaj kristanoj kaj lia filo, sed ĉar la laboro superas liajn fortojn, tial li volis lin elaĉeti. Sed Pansa preferis reteni kaj la monon, kaj la sklavon. Tiel parolante, li komencis plori, kaj mi miksis miajn larmojn al la liaj, kion mi faris facile pro la boneco de mia koro kaj pro ŝirdoloro en la piedoj, kiun mi ricevis pro troa irado. Mi komencis ĉe tio plendi, ke veninte antaŭ kelkaj tagoj el Neapolo, mi konas neniu el la fratoj kaj ne scias, kie ili kunvenas por kune preĝi. Li ekmiris, ke la kristanoj el Neapolo ne donis al mi leterojn al la romaj fratoj, sed mi diris al li, ke oni ilin ŝtelis de mi en la vojo. Tiam li diris, ke mi venu nokte al la riverbordo, kaj li konatigos min kun la fratoj, kiuj kondukos min en la preĝodomojn kaj al la ĉefuloj, kiuj regas la kristanan komunumon. Ekaŭdinte tion, mi tiel ekĝojis, ke mi donis al li sumon, bezonatan por elaĉeti lian filon, esperante, ke la grandanima Vinicio duoble ĝin al mi redonos...

— Ĥilono, — interrompis Petronio, — en cia rakonto mensogo naĝas sur la supraĵo de la vero, kiel olivoleo sur akvo. Ci alportis gravajn sciigojn, tion mi ne neas. Mi eĉ asertas, ke granda paŝo estas farita por trovi Ligian, sed ci ne grasigu per mensogo ciajn novaĵojn. Kiel nomas sin la maljunulo, de kiu ci eksciis, ke la kristanoj ekkonas sin reciproke per la signo de fiŝo?

— Eŭrikio, sinjoro. Kompatinda, malfeliĉa maljunulo! Li rememorigis al mi Glaŭkon la kuraciston, kiun mi defendis kontraŭ la rabistoj, kaj ĉefe per tio li min kortuŝis.

— Mi kredas, ke ci konatiĝis kun li kaj ke ci scios elprofiti tiun ĉi konatecon, sed monon ci al li ne donis. Ci ne donis al li eĉ ason, ci min komprenas! Ci nenion donis!

— Sed mi helpis al li porti la sitelojn kaj parolis pri lia filo kun plej granda kunsento. Jes, sinjoro! Kio povas kaŝi sin de la penetremo de Petronio? Do, mi ne donis al li monon, aŭ, pli ĝuste, mi donis ĝin al li, sed en la animo, en la menso, kio, se li estus vera filozofa, devus al li sufiĉi ... Kaj mi donis tial, ke mi konsideris tian agon necesa kaj utila, ĉar pensu, sinjoro, kiel ĝi tuj favorigus al mi ĉiujn kristanojn, kiel ĝi faciligus aliron al ili kaj kian fidon vekus en ili.

— Vere, — diris Petronio, — kaj ci devis ĝin fari.

— Ĝuste tial mi venas ĉi tien, por ke mi povu ĝin fari.

Petronio sin turnis al Vinicio:

— Ordonu dekalkuli al li kvin mil sestercojn, sed mense, en la animo.

Sed Vinicio diris:

— Mi donos al ci servanton, kiu portos la bezonan sumon, kaj ci diros al Eŭrikio, ke la servanto estas cia sklavvo, kaj en lia ĉeesto ci transdonos al li la monon. Ĉar ta-

men ci alportis gravan sciigon, saman sumon ci ricevos por ci mem. Venu preni la servanton kaj la monon hodiaŭ vespere.

— Jen vera imperiestro! — diris Hîlono. — Permesu, sinjoro, ke mi dediĉu al ci unu el miaj verkoj, sed permesu ankaŭ, ke hodiaŭ vespere mi venu sole por preni la monon, ĉar Eŭrikio diris al mi, ke oni elŝarĝis jam ĉiujn flosojn, kaj novaj venos el Ostio<sup>188</sup> nur post kelkaj tagoj. Paco estu al vi! Tiel sin adiaŭas la kristanoj ... Mi aĉetos al mi sklavinon, tio estas, mi volis diri, sklavon. Fiŝojn oni kaptas per fiŝkaptilo, kaj kristanojn per fiŝo. Paco al vi! Paco!... Paco!... Paco!...

## Ĉapitro 15<sup>a</sup>

Petronio al Vinicio:

*«Per fidata sklavo mi sendas al ci el Ancio ĉi tiun leteron, al kiu, mi esperas, ci respondos per la sama sklavo sen troa prokrasto, kvankam cia mano pli kutimas al glavo kaj lanco ol al plumo. Mi lasis cin sur bona vojo kaj plenan je espero, do mi supozas, ke ci aŭ jam la dolĉan pasion kvietigis en la brakoj de Ligia, aŭ ĝin kvietigos antaŭ ol la vera vintra vento blovos sur Kampanion de la supro*

<sup>188</sup> Lat. *Ostia*; la ĉefa marhavena urbo de la antikva Romo, kaj ĝia unua kolonio ĉe la enfluejo de Tiberio en Mediteraneon.

*de Sorakto. Ho mia Vinicio! Estu al ci majstrino la ora diino de Kipro, kaj ci estu majstro al tiu ligia Aŭroro, kiu forkuras de la suno de amo. Ankaŭ ĉiam memoru, ke marmoro per si mem, eĉ plej multekosta, estas nenio, kaj ke veran valoron ĝi ricevas nur kiam en ĉefverkon ĝin transformas la mano de skulptisto. Tia skulptisto estu ci, carissime!<sup>189</sup> Ami ne sufiĉas, necesas scii ami kaj necesas scii instrui amon. Volupton sentas ja eĉ la plebo, kaj eĉ bestoj, sed vera homo — ĝuste per tio de ili diferencas, ke li ĝin kvazaŭ ŝanĝas en noblan arton, kaj, ĝuante, scias tion, ĝian tutan valoron klare konscias en penso, kaj tiel ne nur la korpon, sed ankaŭ la animon satigas. Nemalofte, kiam mi pensas ĉi tie pri la vanteco, necerteco kaj enuo de nia vivo, venas en mian kapon la penso, ke ci eble eĉ pli bone elektis, ke ne la imperiestra kortego, sed milito kaj amo estas la du solaj aferoj por kiuj valoras naskiĝi kaj vivi.*

*En milito ci estis feliĉa, estu do feliĉa ankaŭ en amo, kaj se cin interesas, kio okazas en la imperiestra kortego, mi sciigos cin pri tio de tempo al tempo. Jen ni sidas en Ancio kaj flegas nian ĉielan voĉon; ni plu sentas la ĉiaman malamon al Romo, kaj por la vintro ni intencas iri en Bajon por prezentiĝi publike en Neapolo, kies loĝantoj, estante grekoj, pli bone scios nin taksi ol la lupina idaro,*

<sup>189</sup> Lat. *carissime!* [karisime] — vokkazo de «plej karal!», «karulo!»



loĝanta ĉe la bordoj de Tibero. Homoj alkuros el Bajo, el Pompejo, el Puteolo, el Kumo, el Stabio,<sup>190</sup> ne mankos al ni aplaŭdoj, nek laŭraj kronoj, kaj tio kuraĝigos nin al la intencata iro en Aĥajon<sup>191</sup>. Kaj la memoro pri la malgranda aŭgustino? Jes! Ni ŝin ankoraŭ priploras. Ni kantas himnojn, komponitajn de ni mem, tiel belege, ke sirenoj pro envio kaŝis sin en plej profundajn kavernojn de Amfitrito<sup>192</sup>. Aŭskultus nin, anstataŭe, delfenoj, se ilin ne malhelpus la bruado de la maro. Nia doloro ĝis nun ne kvietiĝis, ni do montras ĝin al la homoj en ĉiuj formoj, kiujn instruas la skulptarto, zorge atentante ĉe tio, ĉu ni estas kun ili belaj kaj ĉu la homoj scias rekoni ĉi tiun belecon. Ho, mia kara! Ni mortos kiel arlekenoj kaj histrionoj. Estas ĉi tie ĉiuj aŭgustanoj kaj aŭgustaninoj, ne kalkulante kvincent azeninojn, en kies lakto sin banas Popea, kaj dek mil servistojn. Iafoje estas eĉ gaje. Kalvia Krispinilla maljuniĝas; oni diras, ke ŝi petis de Popea la permeson sin bani tuj post ŝi. Al Nigidia Lukano donis vangofrapon, suspektante ŝin pri rilato kun gladiatoro. Sporo malgajnis la edzinon, kubludante kun Seneciono. Torkvato Sila-

<sup>190</sup> Bajo, Pompejo<sup>2</sup>, Puteolo, Kumo, Stabio (lat. *Bajæ, Pompeji, Puteoli, Cumæ, Stabiæ*) — urbetoj en Kampanio, detruotaj de erupcio de Vezuvio en la 79<sup>a</sup> jaro.

<sup>191</sup> Gr. Ἀχάϊα — Homera nomo de Grekujo.

<sup>192</sup> Malnovgreka diino de la maro, edzino de Pozidono.

*no proponis al mi por Eŭniko kvar kaŝtankolorajn ĉevalojn, kiuj eksterdube venkos ĉi-jare en vetkuro. Mi ne volis! Kaj ankaŭ al ci mi dankas, ke ci ŝin ne akceptis. Rilate al Torkvato Silano, li eĉ ne divenas, kompatindulo, ke li estas jam pli ombro ol homo. Lia morto jam estas decidita. Kaj ĉu ci scias, kio estas lia kulpo? Jen li estas pranepo de la dia Aŭgusto. Nenia savo estas por li. Tia estas nia mondo.*

*Ni atendis ĉi tie, kiel ci scias, Tiridaton; dume Valagaŝo skribis ofendan leteron. Ĉar li konkeris Armenujon, li petas ke ni lasu ĝin al li por Tiridato; kaj se ni ne lasos, li tutegale ĝin ne redonos. Puraj mokoĵoj! Do ni decidis militon. Korbulono ricevos tian povon, kian dum la milito kontraŭ la maraj rabistoj havis la granda Pompeo<sup>193</sup>. Estis tamen momento, ke Nerono hezitis: li timas videble la gloron, kiun en okazo de venko povas akiri Korbulono. Oni eĉ konsideris, ĉu ne oferi la ĉefkomandon al nia Aŭlo. Kontraŭstaris tion Popea, kiun la virto de Pomponia videble incitas kiel salo en la okulo.*

*Vatinio promesis al ni iajn eksterordinarajn lukt-ojn de gladiatoroj, aranĝotajn de li en Benevento.*

<sup>194</sup> *Vidu, kion malgraŭ la diro: ne sutor supra cre-*

<sup>193</sup> «**Pompeo**. Romana nomo, i.a. de generalo kaj regnestro, malamiko de Cezaro (C. Pompeius, 106–48 a.K.)» [NPiV]

<sup>194</sup> Lat. *Beneventum* — urbo en la suda Italio.

pidam,<sup>195</sup> atingas ŝuistoj en nia tempo! Vitelio, kiu estas posteulo, kaj Vatinio senpera filo de ŝuisto. Eble li eĉ mem iam alenkudris! La histriono Alituro mirinde prezentis hieraŭ Edipon. Mi ankaŭ demandis lin, kiel judon, ĉu la judoj kaj la kristanoj estas la samo? Li respondis al mi, ke la judoj havas sian religion de jarmiloj, dum la kristanoj apartenas al nova sekto, kiu antaŭ nelonge estis kreita en Judeo. Oni krucumis tie dum la regado de Tiberio iun homon, kies konfesantoj multiĝas tagon post tago kaj konsideras lin dio. Ŝajnas, ke iujn aliajn diojn, precipe la niajn, ili ne volas koni. Mi ne komprenas, kiel tio povus al ili malutili. Tigeleno jam elmontras al mi malkaŝan malamikecon. Ĝis nun li ne povas min superforti, sed li havas avantaĝon en unu afero. Jen li pli zorgas pri la vivo kaj ankaŭ estas pli granda fripono ol mi, kio lin proksimigas al Ahenobarbo. Tiuj du interkompreniĝos pli aŭ malpli frue, kaj tiam venos mia vico.

Kiam tio estos, mi ne scias, sed, ĉar ĉiuokaze ĝi devos iam esti, la dato ne gravas. Dume oni amuziĝu. La vivo per si mem ne estus malbona, se ne estus la Kuprobarba. Dank' al li homo iafoje abomenas sin mem. Vane estas konsideri la bataladon pri liaj favoroj kiel ian cirkan vetkuron, kiel ian ludon, ian lukton, en kiu venko flatas la memam-

<sup>195</sup> Ŝuisto ne juĝu super ŝuo (lat.).

*on. Mi vere ofte tiel prezentas al mi la aferon, tamen iafoje ŝajnas al mi, ke mi estas ia Ĥilono kaj neniu pli bona ol li. Kiam ci ĉesos lin bezoni, sendu lin al mi. Mi ekŝatis liajn edifiantajn interparolojn. Salutu de mi cian kristaninon, aŭ pli ĝuste, petu ŝin en mia nomo, ke ŝi ne estu por ci fiŝo. Sciigu min pri cia amo, sciu ami kaj instruu ami. Adiaŭ.»*

Marko Gajo Vinicio al Petronio:

*«Ligia ĝis nun ne estas trovita! Se mi ne esperus baldaŭ ŝin retrovi, ci ne ricevus respondon, ĉar kiam la vivo iĝas teda, oni ne emas skribi. Mi volis kontroli, ĉu Ĥilono min ne trompas, kaj en la sama nokto, kiam li venis preni la monon por Eŭrikio, mi kovris min per militista mantelo kaj sekvis ne rimarkite lin kaj la knabon, kiun mi aldonis al li. Kiam ili venis en la difinitan lokon, mi observis ilin de malproksime, kaŝite post havena kolono, kaj mi konvinkiĝis, ke Eŭrikio ne estas elpensita figuro. Malsupre, ĉe la rivero, kelkdek homoj elŝarĝadis ĉe torĉoj ŝtonojn el grandega fluso kaj metadis ilin ĉe la bordo. Mi vidis, kiel Ĥilono proksimiĝis al ili kaj komencis interparoli kun iu maljunulo, kiu post momento falis al liaj piedoj. La aliaj grupiĝis ĉirkaŭ ili, elegante ekkriojn de miro. An-*

taŭ miaj okuloj la sklavo transdonis la sakon al Eŭrikio, kiu, kaptinte ĝin, komencis preĝi kun suprenlevitaj okuloj, kaj apud li surgenuiĝis iu alia, videble lia filo. Ĥilono parolis ankoraŭ ion pli, kion mi ne povis aŭdi, kaj benis tiel la genuantojn, kiel la aliajn, farante ĉe tio en la aero signojn en la formo de kruco, kiun ili videble adoras, ĉar ĉiuj fleksis la genuojn. Mi sentis emon veni malsupren al ili kaj promesi tri tiajn sakojn al tiu, kiu transdonos al mi Ligian, sed mi timis malhelpi al Ĥilono en liaj planoj kaj, post momenta konsidero, mi foriris.

Tio okazis almenaŭ dek du tagojn post cia forveturo. De tiu tempo li vizitis min kelkajn fojojn. Li mem rakontis al mi, ke li akiris grandan influon inter la kristanoj. Li diras, ke se li ne trovis Ligian ĝis nun, tio estas tial, ke la kristanoj estas jam sennombre multaj en Romo mem, do ne ĉiuj konas sin reciproke kaj ne povas scii ĉion, kio okazas inter ili. Ili estas ankaŭ singardemaj kaj ĝenerale neparolemaj, li tamen certigas, ke se li nur atingos la ĉefulojn, kiujn oni nomas «presbiteroj», li scios eligi de ili ĉiujn sekretojn. Kelkajn li jam konis kaj penis ilin esplori, sed gardeme, por per rapido ne vekti suspektojn kaj ne malfaciligi la laboron. Kaj, kvankam malfacile estas atendi, kvankam mankas al mi pacienco, mi sentas, ke li pravas, kaj mi atendas.

Li eksciis ankaŭ, ke ili havas komunajn preĝolokojn, ofte ekster la urbaj muregoj en malplenaj domoj kaj eĉ en sablofosejoj. Tie ili gloras Kriston, kantas kaj festenas. Tiaj lokoj estas multaj. Ĥilono supozas, ke Ligia intence vizitas aliajn ol Pomponia, por ke la lasta, en okazo de juĝo kaj esploro, povu purkonsciencite ĵuri, ke ŝi ne konas ŝian kaŝejon. Povas esti, ke la presbiteroj konsilis al ŝi tiun singardemon. Kiam Ĥilono ekkonos jam tiujn lokojn, mi vizitados ilin kune kun li kaj, se la dioj permesos al mi ekvidi Ligian, mi ĵuras al ci je Ĵovo, ke ĉi-foje ŝi ne forkuros el miaj manoj.

Mi pensas senĉese pri tiuj preĝolokoj. Ĥilono ne volas, ke mi iradu tien kun li. Li timas, sed mi ne povas sidi hejme. Mi rekonos ŝin tuj, eĉ alivestitan aŭ vualitan. Ili kunvenas tie nokte, sed mi rekonos ŝin eĉ nokte. Mi rekonus ĉie ŝian voĉon kaj sintenon. Mi mem iros alivestita kaj atentos ĉiun, kiu eniros kaj eliros. Mi pensas pri ŝi senĉese, do mi ŝin rekonos. Ĥilono devas veni morgaŭ, kaj ni iros. Mi kunprenos armilon. Kelkaj miaj sklavoj, senditaj provincon, revenis kun nenio. Sed nun mi estas certa, ke ŝi estas ĉi tie, en la urbo, eble eĉ ne malproksime. Mi ankaŭ mem vizitis multajn domojn, pretekstante luon. Ĉe mi estos al ŝi centoble pli bone, ĉar tie vivas tutaj amasoj da malriĉuloj. Mi ja nenion al ŝi avaros.

Ci skribas, ke mi bone elektis, sed jen mi ja elektis

*zorgojn kaj ĉagrenojn. Ni iros unue en tiujn domojn, kiuj estas en la urbo, poste ekster la pordegojn. La espero atendas ion de ĉiu morgaŭo — alie oni ne povus vivi. Ci diras, ke oni sciu ami; mi ja sciis paroli kun Ligia pri amo, sed nun mi nur sopiras, nur atendas Hilonon kaj hejme min sentas neelteble. Adiaŭ».*

## Ĉapitro 16<sup>a</sup>

Ĥilono tamen ne montris sin sufiĉe longe, tiel ke Vinicio fine ne sciis, kion pri tio opinii. Vane li ripetadis al si, ke la serĉado, se oni deziras sukcesajn rezultojn, devas esti malrapida. Same lia sango, kiel lia ekscitema naturo, ribelis kontraŭ la voĉo de prudento. Nenion fari, atendi, sidi kun senage kunmetitaj manoj, estis io tiel kontraŭa al lia karaktero, ke neniel li povis akcepti tion. Trakurado de la urbaj stratetoj en malhela, sklava mantelo, pro tio mem, ke ĝi estis vana, ŝajnis al li nura trompado de sia senfareco kaj ne povis lin kontentigi. Liaj liberigitoj, homoj spertaj, al kiuj li ordonis entrepreni apartajn serĉadojn, montriĝis centoble malpli lertaj ol Ĥilono.

Dume, krom la amo, kiun li sentis al Ligia, naskiĝis en li ankaŭ la obstino de ludisto, kiu volas venki. Vinicio ĉiam estis tia. De siaj plej junaj jaroj li ĉiam celatingis

kion li volis, kun pasio de homo kiu ne komprenas, ke io povas malsukcesi, aŭ ke oni devas ion rezigni. La militista rigoro, vere, disciplinis por iom da tempo lian memvolon, sed kune enradikigis al li la konvinkon, ke ĉiu ordono, kiun li direktas al homoj malpli altrangaj, devas esti plenumita, kaj la longa restado en Oriento, inter homoj fleksemaj kaj kutimantaj al sklava obeado, konfirmis en li la kredon, ke por lia «mi volas» ne ekzistas limoj. Nun do sangis dolore ankaŭ lia memamo. En tiuj kontraŭaĵoj, en tiu rezisto kaj en la forkuro mem de Ligia estis, krome, io por li nekomprenebla, ia enigmo, por kies solvo li mortlace streĉis la kapon.

Li sentis, ke Akteo diris la veron kaj ke li ne estis por Ligia indiferenta. Sed se tiel estis, kial ŝi preferis vagan vivon kaj mizeron ol lian amon, ol liajn karesojn kaj restadon en lia luksa domo? Al tiu demando li ne sciis trovi respondon, li nur akiris, anstataŭe, ian malklaran senton, ke inter li kaj Ligia kaj inter iliaj ideoj, inter la mondo de li mem kaj Petronio kaj la mondo de Ligia kaj Pomponia Grecina ekzistas ia diferenco, ia miskompreno, profunda, kiel abismo, kiun nenio povos plenigi kaj ebenigi. Tiam ŝajnis al li, ke li devas perdi Ligian, kaj ĉe tiu penso li perdadis la reston de la anima ekvilibro, kiun Petronio volis en li konservi. Estis momentoj, kiam li mem ne sciis, ĉu li



amas Ligian aŭ ŝin malamas, li nur komprenis, ke li devas ŝin trovi kaj ke li preferus, ke la tero lin englutu, ol ke li neniam ŝin revidu kaj ekposedu. Dank' al la forto de la imago li vidadis ŝin kelkfoje tiel precize, kvazaŭ ŝi starus antaŭ li; li rememoris ĉiun vorton, kiun li diris al ŝi kaj kiun li de ŝi aŭdis. Li sentis ŝin proksime, li sentis ŝin ĉe la brusto, en la brakoj, kaj tiam la pasio ekregadis lin, kiel flamo. Li amis ŝin kaj vokis ŝin.

Kaj kiam li pensis, ke li estis de ŝi amata kaj ke ŝi povis prapravole plenumi ĉion, kion li de ŝi deziris, kaptadis lin doloro premega, senmezura, kaj granda sentemo plengigadis lian koron, kvazaŭ senlima ondo. Sed li havis ankaŭ momentojn, kiam li paliĝadis pro furiozo kaj ĝuis pensojn pri humiligo kaj suferoj, kiujn li kaŭzos al Ligia, kiam li ŝin retrovos. Li volis ne nur ŝin havi, sed havi ŝin kiel piedpremitan sklavinton; kaj kune li sentis, ke se oni lasus lin elekti: ĉu esti ŝia sklavo, aŭ revidi ŝin neniam plu en la vivo, li preferus esti ŝia sklavo. Estis tagoj, kiam li pensis pri signoj, kiujn sur ŝia rozkolora korpo postlasus vipo, kaj samtempe li volus kisi tiujn signojn. Ankaŭ venis en lian kapon, ke li estus feliĉa, se li povus ŝin mortigi.

En tiu konfuzo, en tiu laceco, necerteco kaj aflikto li perdadis sian sanon, kaj eĉ la belecon. Li iĝis ankaŭ senindulga kaj kruela mastro. Liaj sklavoj, kaj eĉ liberigitaj,

proksimiĝadis al li kun tremo, kaj ĉar sen iuj kaŭzoj trafadis ilin punoj, same senkompataj, kiel malpravaj, ili komencis lin kaŝe malami. Li, sentante tion kaj sentante sian forlasitecon, tiom pli venĝis kontraŭ ili. Li moderigadis sin sole kun Ĥilono, timante, ke ĉi-lasta ĉesus la serĉadon; kaj la greko, rimarkinte tion, komencis lin superregi kaj iĝi ĉiam pli postulema. Unue dum ĉiu sia vizito li certigadis Vinicion, ke la afero iros facile kaj rapide; nun li komencis mem eltrovi malfacilaĵojn, ne ĉesante, vere, garantii la senduban bonrezulton de la serĉado. Li ne kaŝis tamen, ke tio devas ankoraŭ longe daŭri.

Li venis fine, post longaj tagoj de atendado, kun vizaĝo tiel malserena, ke la juna viro paliĝis je lia vido kaj, saltinte al li, apenaŭ havis la forton demandi:

— Ĉu ŝi ne estas inter la kristanoj?

— Ŝi estas, sinjoro, — respondis Ĥilono, — sed mi trovis inter ili Glaŭkon, la kuraciston.

— Pri kio ci parolas, kaj kiu li estas?

— Do ci forgesis, sinjoro, pri la maljunulo, kun kiu mi migris el Neapolo al Romo kaj kiun defendante, mi perdis tiujn ĉi du fingrojn, kies perdo ne lasas min preni plumon en la manon? La rabistoj, kiuj forkaptis lian edzinon kaj infanojn, frapis lin per ponardo. Mi lasis lin agonianta en gastejo apud Minturnoj kaj longe mi lin priploris. Bedaŭr-

inde mi konvinkiĝis, ke li vivas ĝis nun kaj apartenas al la kristana komunumo en Romo.

Vinicio, kiu ne povis kompreni, pri kio temas, konceptis nur tion, ke tiu Glaŭko prezentas ian baron en la serĉado de Ligia, li do subpremzis la koleron, kiu kreskis en li, kaj diris:

— Se ci lin defendis, li devus esti dankema kaj helpi al ci.

— Ha, nobla tribunuso! Eĉ dioj ne ĉiam estas dankemaj, kion do diri pri homoj. Jes, li devus esti al mi dankema. Malfeliĉe, li estas tamen maljunulo kun malforta menso, maklarigita de la aĝo kaj ĉagrenoj, kaj tial li ne nur ne estas al mi dankema, sed, kiel mi eksciis ĝuste de liaj samkonfesantoj, li akuzas min, ke mi interkonsentis kun la rabistoj kaj ke mi estas la kaŭzo de liaj malfeliĉoj! Jen mia rekompenco por la du fingroj!

— Mi estas certa, fripono, ke estas tiel, kiel li rakontas, — diris Vinicio.

— Ci do scias pli multe ol li, sinjoro, — respondis digne Ĥilono, — ĉar li nur supozas, ke tiel estis, kio tamen ne malhelpus al li kunvoki kristanojn kaj kruele venĝi kontraŭ mi. Li tion farus sendube, kaj la aliaj same sendube helpus al li. Feliĉe li ne konas mian nomon, kaj en la preĝodomo, kie ni renkontiĝis, li min ne rimarkis. Mi ta-

men tuj lin rekonis kaj en la unua momento mi volis min ĵeti ĉirkaŭ lian kolon. De tio min detenis nur la prudento kaj kutimo pripensi ĉiun paŝon, kiun mi intencas fari. Mi komencis post la eliro el la preĝodomo demandi pri li, kaj tiuj, kiuj lin konas, diris al mi, ke tio estas homo, kiun perfidis kunvojaĝanto envoje el Neapolo ... Alie mi ja ne scius, ke li tion rakontas.

— Tio min neniel interesas! Parolu, kion ci vidis en la preĝodomo.

— Cin tio ne interesas, sinjoro, sed min tio interesas tiom same, kiom la tuto de mia propra haŭto. Kaj ĉar mi volas, ke mia instruo postvivu min, mi preferas rezigni la rekompencan, kiun ci promesis al mi, ol riski la vivon por la vantaj riĉaĵoj de tiu ĉi mondo, sen kiuj, kiel vera filozofo, mi scios vivi kaj serĉi la dian veron.

Sed Vinicio proksimiĝis al li kun malbonaŭgura vizaĝo kaj komencis paroli per obtuzigita voĉo:

— Kaj kiu al ci diris, ke morto pli certe trafos cin el la mano de Glaŭko ol el la mia? De kie ci scias, hundo, ĉu oni cin tuj ne enterigos en mia ĝardeno?

Ĥilono, kiu estis timulo, rigardis Vinicion kaj en unu sekundo ekkomprenis, ke se li diros malprudente unu vorton pli, li pereos senrevoke.

— Mi serĉos ŝin, sinjoro, kaj mi trovos ŝin! — li ekkriis

momente.

Sekvis silento, dum kiu oni aŭdis nur la rapidan spiradon de Vinicio kaj malproksiman kantadon de sklavoĵoj, laborantaj en la ĝardeno.

Nur post momento la greko, rimarkinte, ke la juna patricio jam iom trankviliĝis, komencis paroli:

— La morto pasis preter mi, sed mi rigardis ĝin kun tia trankvilo, kiel Sokrato. Ne, sinjoro! Mi ne diris al ci, ke mi rezignas la serĉadon de la fraŭlino, kaj mi nur volis al ci diri, ke tiu serĉado estos nun ligita kun pli granda danĝero por mi. Ci dubis antaŭ kelka tempo, ĉu en la mondo ekzistas Eŭrikio, kaj kvankam per ciaj okuloj ci konvinkiĝis, ke la filo de mia patro diris al ci la veron, ci suspektas nun, ke mi elpensis al ci Glaŭkon. Ve! Se li estus nur elpenŝaĵo, se mi povus kun plena sekureco iradi inter la kristanojn, kiel mi antaŭe iradis, mi cedus por tio la mizeran, maljunan sklavinon, kiun mi aĉetis antaŭ tri tagoj, ke ŝi prizorgu mian aĝon kaj kriplecon. Sed Glaŭko vivas, sinjoro, kaj se li min foje ekvidus, ci ne vidus min plu, kaj en tiu okazo kiu retrovus por ci la fraŭlinon?

Li eksilentis kaj komencis viŝi larmojn, poste li parolis plu:

— Sed kiel longe Glaŭko vivas, kiel mi ŝin serĉu, se ĉiumomente mi povas lin renkonti, kaj se mi lin renkont-

os, mi pereos kaj kun mi pereos mia serĉado.

— Al kio ci celas? Kion ci konsilas? Kaj kion ci volas entrepreni? — demandis Vinicio.

— Aristotelo instruas nin, sinjoro, ke oni devas oferi aferojn malpli grandajn por la pli grandaj, kaj la reĝo Priamo ofte diris, ke maljuneco estas peza ŝarĝo. Jen la ŝarĝo de maljuneco kaj malfeliĉoj premas Glaŭkon de longe kaj tiel peze, ke morto estus por li bonfaro. Ĉar kio, laŭ Seneko, estas morto, se ne liberigo?

— Arlekeno kun Petronio, ne kun mi, kaj diru, kion ci volas?

— Se virto estas arlekenaĵo, lasu min la dioj ĉiam esti arlekeno. Mi volas, sinjoro, forigi Glaŭkon, ĉar kiel longe li vivas, tiel mia vivo, kiel la serĉado estas en senĉesa danĝero.

— Dungu do homojn, ke ili lin mortbatu per bastonoj, kaj mi ilin pagos.

— Ili igos cin tropagi, sinjoro, kaj poste ekspluatos la sekreton. En Romo estas tiom da friponoj, kiom da sableroj sur areno, sed ci ne kredus, sinjoro, kiel postulemaj ili estas, se honesta homo bezonas dungi ilian friponecon. Ne, nobla tribunuso! Kaj se *vigiloj* kaptus la murdistojn ĉe la mortigo? Ili sendube konfesus, kiu ilin dungis, kaj ci havus embarason. Sed min ili ne montros, ĉar mi ne diros

al ili mian nomon. Ci malbone faras, sinjoro, ke ci ne fidas al mi, ĉar, ne parolante jam pri mia honesteco, memoru, ke la afero koncernas du aliajn aĵojn: mian propran haŭton kaj la rekompencan, kiun ci al mi promesis.

— Kiom ci bezonas?

— Mi bezonas mil sestercojn, ĉar konsideru, sinjoro, ke mi devas trovi honestajn friponojn, kiuj, ricevinte antaŭpagon, ne malaperos kun ĝi sen ia scio. Por bona laboro — bona pago! Ankaŭ por mi utilis sumeto por sekigi la larmojn, kiujn mi elverŝos pro Glaŭko. La diojn mi alvokas ateste, kiel mi lin amis. Se mi ricevos hodiaŭ mil sestercojn, post du tagoj lia animo estos en Hadeso, kaj nur tie, se la animoj konservas memoron kaj pensokapablon, li komprenos, kiel mi lin amis. Jam hodiaŭ mi trovos la homojn kaj avertos ilin, ke, ekde morgaŭ, por ĉiu tago de vivo de Glaŭko, mi malgrandigos ilian rekompencan je cent sestercoj. Mi havas ankaŭ certan planon, kiu ŝajnas al mi senerara.

Vinicio ankoraŭfoje promesis al li la postulatan sumon, sed malpermesis paroli plu pri Glaŭko; li demandis, anstataŭe, kiajn aliajn novaĵojn li alportas, kie li estis dum tiu tempo, kion li vidis kaj kion malkovris. Sed Ĥilono ne povis komuniki al li multajn novaĵojn. Li estis en ankoraŭ du preĝodomoj kaj atente observis ĉiujn, precipe

la virinojn, sed rimarkis neniu, kiu similus al Ligia. La kristanoj tamen konsideras lin kiel sian homon, kaj de la tempo, kiam li donis la monon por elaĉeti la filon de Eŭri-  
kio, ili respektas lin kiel tiun, kiu iras «la vojon de Ĥresto<sup>196</sup>». Li ankaŭ eksciis de ili, ke granda leĝodonanto, iu Paŭlo el Tarso, sin trovas en Romo, malliberigite pro akuzo farita de judoj, kaj li decidis konatiĝi kun li. Sed plej multe lin ĝojigis alia novaĵo, nome, ke la ĉefa pastro de la tuta sekto, kiu estis disĉiplo de Kristo kaj al kiu tiu lasta konfidis la regadon de la tutmonda kristanaro, estas ankaŭ venonta en Romon en plej proksima tempo. Ĉiuj kristanoj kompreneble volos lin vidi kaj aŭdi liajn instruojn. Okazos grandegaj kunvenoj, kiujn partoprenos ankaŭ li, Ĥilono, kaj plie, ĉar en amaso facile estas sin kaŝi, li enkondukos ankaŭ Vinicion. Tiam ili certe trovos Ligian. De kiam oni forigos Glaŭkon, tio eĉ ne estos tre danĝera. Koncerne venĝon, venĝus kompreneble eĉ la kristanoj, sed ĝenerale ili estas trankvilaj homoj.

Kaj Ĥilono komencis rakonti kun certa miro, ke li neniam rimarkis, ke ili malĉastas, venenas putojn kaj fon-

<sup>196</sup> La vorto «Kristo» devenas el la greka Χριστός /ĥristós/, «(sankt)oleito», laŭvorta grekigo de la hebrea «maŝiaĥ» (t.e. «mesio»). Tiu nocio ne estas konata ekster la juda-kristana tradicio, tial la romanoj konfuzis ĝin kun simila greka vorto χρηστός /ĥrēstós/, «bona, justa, utila», kiu estis pli konvena kiel nomo propra. Tial ekz-e Tacito en siaj «Analoj» nomas kristanojn adeptoj de iu «Chrestus» (/ĥrestus/, latinigo de Χρηστός).



tanojn, ke ili estas malamikoj de la homa gento, adoras azenon aŭ nutras sin per la viando de infanoj. Ne! Tion li ne vidis. Sendube, li trovos inter ili ankaŭ iujn, kiuj por mono mortigos Glaŭkon, sed ilia instruo, kiom li scias, instigas al neniaj krimoj, kontraŭe, ordonas pardoni ofendojn.

Vinicio rememoris ankaŭ, kion ĉe Akteo diris al li Pomponia Grecina, kaj ĝenerale li aŭskultis la vortojn de Ĥilono kun ĝojo. Kvankam lia sento al Ligia alprenis kelkfoje aspekton de malamo, li spertis konsolon, aŭdante, ke la instruo, kiun konfesis tiel ŝi, kiel Pomponia, estas nek krima, nek malĉasta. Naskiĝadis en li tamen malklara sento, ke ĝuste ĉi tiu instruo, tiu al li nekonata kaj mistera kulto al Kristo, kreis la abismon inter li kaj Ligia, do li komencis timi tiun instruon kaj ĝin malami.

## Ĉapitro 17<sup>a</sup>

Por Ĥilono efektive gravis forigi Glaŭkon, kiu, kvankam en maljuna aĝo, tute ne estis kadukulo. En tio, kion Ĥilono rakontis al Vinicio, granda parto estis vera. Li konis iam Glaŭkon, perfidis lin, sklavigis al rabistoj, senigis je la familio kaj havaĵo, kaj elmetis al murdo. La memoro pri tiuj okazoj tamen ne pezis al li, ĉar li lasis sian viktimon agonianta ne en gastejo, sed en kampo apud Minturnoj, kaj ne antaŭvidis nur unu aferon — ke Glaŭko resaniĝos de la vundoj kaj venos en Romon. Tial, ekvidinte lin en la preĝodomo, li efektive teruriĝis kaj en la unua momento vere volis rezigni la serĉadon de Ligia. Sed aliflanke Vinicio teruris lin ankoraŭ pli. Li komprenis, ke li devas elekti inter la timo antaŭ Glaŭko kaj persekuto kaj venĝo de la potenca patricio, kiun sendube subtenus alia, ankoraŭ pli potenca, Petronio. Konsiderinte tion, Ĥilono ĉesis heziti. Li ekpensis, ke pli bone estas havi malamikojn malgrandajn ol grandajn, kaj kvankam lia timema naturo tremis antaŭ sangaj rimedoj, li tamen akceptis kiel nepra mortigon de Glaŭko per fremdaj manoj.

Nun li klopodis nur pri elekto de la homoj, kaj ĝuste ilin koncernis la plano, pri kiu li menciis al Vinicio. Pasigante plej ofte la noktojn en vinejoj kaj noktante tie inter

homoj senrifuĝaj, sen konscienco kaj honoro, li povis facile trovi tiajn, kiuj entreprenus ĉian faron, sed ankoraŭ pli facile tiajn, kiuj, elflarinte ĉe li monon, komencus la laboron de li mem, aŭ, ricevinte antaŭpagon, eldevigus de li la tutan sumon, minacante transdoni lin en la manojn de la *vigiloj*. Cetere de kelka tempo Ĥilono abomenis la ĉifonularon, la fiajn kaj terurajn figurojn, kiuj nestis en suspektindaj domoj en Suburo, aŭ en Transtibero. Mezurante ĉion per sia mezurilo kaj ne konante sufiĉe la kristanojn, nek ilian instruon, li kredis, ke ankaŭ inter ili li trovos volemajn ilojn, kaj ĉar ili ŝajnis al li pli honestaj ol aliaj, li decidis turni sin al ili kaj prezenti la aferon tiel, ke ili entreprenu ĝin ne nur por mono, sed ankaŭ pro fervoro.

Tiacele li iris vespere al Eŭrikio, pri kiu li sciis, ke li estas tutanime sindona al li kaj faros ĉion por lin helpi. Estante tamen laŭnature singardema, li neniel intencis konfidi al li siajn verajn planojn, kiuj cetere klare malakordus kun la opinio de la maljunulo pri la virto kaj pieco de Ĥilono. Li volis havi homojn pretajn al ĉio kaj nur kun ili pritrakti la aferon tiel, ke ili, pro si mem, konservu ĝin eterne en sekreto.

La maljuna Eŭrikio, elaĉetinte sian filon, luis unu el tiuj malgrandaj butiketoj, kiuj svarmis apud la granda cirko por vendadi tie olivoleon, fabojn, senfeĉajn kukojn kaj

akvon dolĉigitan per mielo, al spektantoj venantaj al vetkuroj. Ĥilono trovis lin hejme, aranĝanta la butikon, kaj, salutinte lin en la nomo de Kristo, komencis paroli pri la afero, kiu lin ĉi tien venigis. Jen, farinte al ili komplezon, li esperas, ke ili repagos al li per dankemo. Li bezonas du aŭ tri homojn, fortajn kaj kuraĝajn por forturni danĝeron, kiu minacas ne sole al li, sed al ĉiuj kristanoj. Li estas, vere, malriĉa, ĉar preskaŭ ĉion, kion li havis, li donis al Eŭrikio, tamen tiajn homojn li rekompencus por iliaj servoj, kondiĉe, ke ili fidu al li kaj plenumu fidele ĉion, kion li ordonos al ili plenumi.

Eŭrikio kaj lia filo, Kvarto, aŭskultis lin kiel sian bonfarinton, preskaŭ surgenue. Ili ambaŭ deklaris ankaŭ, ke ili pretaa plenumi ĉion, kion li postulos de ili, ĉar ili kredas ke homo tiel sankta ne povas postuli agojn, kiuj ne harmonius kun la instruo de Kristo.

Ĥilono certigis ilin, ke tiel estas kaj, levinte supren la okulojn, ŝajnis preĝi, dum efektive li pripensis, ĉu ne estos bone akcepti ilian oferon, kiu povus ŝpari al li la mil sestercojn. Sed post momenta pripenso li malakceptis ĝin. Eŭrikio estis maljunulo, ne tiom eble premita de la aĝo, kiom de zorgoj kaj malsano; Kvarto estis nur deksejara; Ĥilono dume bezonis homojn lertajn, kaj antaŭ ĉio fortajn. Koncerne la mil sestercojn, li esperis, ke dank' al

ideo, kiu al li venis, li sukcesos ĉiuokaze ŝpari el ili grandan parton.

Ili insistis dum kelka tempo, sed kiam li decide rifuzis, ili cedis. Kvarto diris tiam:

— Mi konas bakiston Demason, sinjoro, ĉe kies muelŝtonoj laboras sklavoj kaj dungitoj. Unu el tiuj dungitoj estas tiel forta, ke li povas egali ne du, sed kvar homojn, ĉar mi mem vidis, kiel li levis ŝtonegojn, kiujn kvar viroj ne povis movi de la loko.

— Se li estas homo pia kaj ema oferi sin por la fratoj, konigu lin al mi, — diris Ĥilono.

— Li estas kristano, sinjoro, — respondis Kvarto, — ĉar ĉe Demaso laboras plejparte kristanoj. Estas tie noktaj kaj tagaj laboristoj, kaj tiu homo apartenas al la noktaj. Se ni nun irus, ni venus dum ilia vespermanĝo kaj ci povus laŭvole paroli kun li. Demaso loĝas apud Emporio<sup>196</sup>.

Ĥilono konsentis tre volonte. Emporio situis malsupre de Aventino, sekve ne tre malproksime de la Granda cirko.

Oni povis, ne ĉirkaŭirante la montojn, iri laŭlonge de la rivero, tra la Portiko Emilia, kio konsiderinde mallongigis la vojon.

— Mi estas maljuna, — diris Ĥilono, kiam ili subiris la

<sup>196</sup> Lat. *Emporium* — apudhavena bazaro en Romo. Kp la dubindan difinon en la PIV-oj: «**emporio** (hist.) Granda komerc-urbo».

kolonaron, — kaj mia memoro iafoje malklariĝas. Jes! Nia Kristo ja estis perfidita de unu el siaj disĉiploj! Sed la nomon de la perfidulo mi ne povas ĉi-momente rememori.

— Judaso, sinjoro; li pendigis, — diris Kvarto, iom mirante en la animo, ke iu povis forgesi tiun nomon.

— Ha jes! Judaso! Mi dankas cin, — diris Ĥilono.

Kaj dum certa tempo ili iris en silento. Veninte al Emporio, kiu jam estis fermita, ili preterpasis ĝin kaj, ĉirkaŭirinte la grenejojn, kie oni disdonadis grenon al la popolo, ili direktis sin maldekstren, al la domoj, kiuj etendis sin laŭlonge de la Vojo Ostia, ĝis la monto Testacio kaj la Forumo Panista. Tie ili haltis antaŭ ligna konstruaĵo, el kies interno aŭdiĝadis bruo de muelŝtonoj. Kvarto eniris, kaj Ĥilono, kiu ne ŝatis montri sin al granda nombro da homoj kaj timis senĉese, ke iu fato povus renkontigi lin kun Glaŭko, la kuracisto, restis ekstere.

«Interesas min tiu Herkulo, kiu laboras kiel muelisto», li diris al si mem, rigardante la hele lumantan lunon. «Se tio estas fripono kaj saĝa homo, li iom kostos al mi, se tamen li estas virta kristano kaj malsaĝa, li faros senpage ĉion, kion mi de li postulos.»

La pluan pripensadon interrompis al li la reveno de Kvarto, kiu eliris el la konstruaĵo kun alia homo, vestita nur per tuniko, nomata *ekzomido*,<sup>197</sup> tranĉita tiamaniere,

ke la dekstra brako kaj la dekstra brustoflanko restis nudaj. Similan veston, kiel lasantan plenan movliberecon, portadis precipe laboristoj. Ĥilono, rigardinte la veninton, ekspiris kontente, ĉar ĝis nun neniam en la vivo li vidis tian brakon kaj tian bruston.

— Jen estas, sinjoro, — diris Kvarto, — la frato, kiun ci volis vidi.

— La paco de Kristo estu kun ci, — ekparolis Ĥilono, — kaj ci, Kvarto, diru al ĉi tiu frato, ĉu mi meritas kredon kaj fidon, poste iru reen, en la nomo de Dio, ĉar ci ne devas lasi cian maljunan patron en soleco.

— Tio ĉi estas sankta homo, — diris Kvarto, — kiu fordonis sian tutan havaĵon por min, nekonatan de li, elaĉeti el sklaveco. Donu al li por tio nia Sinjoro, la Savinto, ĉielan rekompencan.

La grandega laboristo, aŭdinte tion, kliniĝis kaj kisis la manon de Ĥilono.

— Kiel oni nomas cin, frato? — demandis la greko.

— Ĉe la sankta bapto mi ricevis la nomon Urbano, patro.

— Urbano, mia frato, ĉu ci havas tempon por libere paroli kun mi?

— Nia laboro komenciĝas je noktomezo, kaj nun oni

<sup>197</sup> Latine *exomis* ← gr. ἔξωμις — mallonga tuniko sen manikoj, kiun plejparte portis laboristoj.

nur preparas por ni vespermanĝon.

— Estas do sufiĉe da tempo, — ni iru al la riverbordo, kaj tie ci aŭskultos miajn vortojn.

Ili iris kaj sidiĝis sur ŝtona ĉebordaĵo, en silento, interrompata nur de la malproksima bruoj de la muelŝtonoj kaj de murmurado de la ondoj fluantaj malsupre. Tie Ĥilono fiksas la rigardon sur la vizaĝo de la laboristo, kiu malgraŭ iom severa kaj malgaja esprimo, kian ordinare havis la vizaĝoj de barbaroj loĝantaj en Romo, ŝajnis al li tamen bonkora kaj sincera.

«Jes! — li diris interne al si mem. — Tio estas homo bona kaj malsaĝa, kiu senpage mortigos Glaŭkon.»

Poste li demandis:

— Urbano, ĉu ci amas Kriston?

— Per la koro kaj per la animo mi amas, — respondis la laboristo.

— Kaj ciajn fratojn, kaj ciajn fratinojn, kaj tiujn, kiuj instruis al ci la veron kaj kredon je Kristo?

— Mi amas ankaŭ ilin, patro.

— Paco do estu kun ci.

— Kaj kun ci, patro.

Denove sekvis silento — nur malproksime bruas la muelŝtonoj, kaj malsupre murmuris la rivero.

Ĥilono fiksas la rigardon sur la hela brilo de la luno



kaj per malrapida, mallaŭta voĉo komencis paroli pri la morto de Kristo. Li parolis kvazaŭ ne al Urbano, sed kvazaŭ al si mem, li rememoris tiun morton, aŭ ŝajnis konfidi la sekreton pri ĝi al tiu dormolulata urbo. Estis en tio io kortuŝa kaj samtempe solena. La laboristo ploris, kaj kiam Ĥilono komencis ĝemi kaj plendi, ke en la momento de la morto de la Savinto ĉeestis neniu, kiu lin defendus, se ne de la krucumo, tiam almenaŭ de la ofendoj de la soldatoj kaj judoj — la grandegaj pugnoj de la barbaro kunpremiĝis pro doloro kaj subpremata furiozo. La morto nur movis lian koron, sed ĉe la penso pri tiu popolaĉo mokanta la ŝafidon najlitan al la kruco, ribelis lia animo de simplulo kaj ekregadis lin sovaĝa venĝo-deziro.

Kaj Ĥilono demandis subite:

— Urbano, ĉu ci scias, kiu estis Judaso?

— Mi scias, mi scias! Sed li sin pendumis! — ekkriis la laboristo. Kaj en lia voĉo estis kvazaŭ bedaŭro, ke la perfidulo mem punis sian krimon kaj ne povas jam trafi en liajn manojn.

Sed Ĥilono parolis plu:

— Se li tamen ne estus pendiĝinta kaj se iu el la kristanoj renkontus lin sur kontinento aŭ sur maro, ĉu li ne devus venĝi la suferon, sangon kaj morton de la Savinto?

— Kiu ne venĝus, patro!

— Paco estu kun ci, fidela servanto de la Ŝafido. Jes! Ni rajtas pardoni malbonagojn, faritajn al ni, kiu rajtas tamen pardoni la malbonagon kontraŭ Dio? Sed kiel serpento naskas serpenton, kiel malbono malbonon kaj perfido perfidon, tiel el la veneno de Judaso naskiĝis alia perfidulo, kaj kiel la unua transdonis al la judoj kaj romiaj soldatoj la Savinton, tiel ĉi tiu, kiu vivas inter ni, intencas transdoni liajn ŝafojn al lupoj, kaj, se neniu kontraŭagos la perfidon, se neniu polvigos antaŭtempe la kapon de la serpento, nin ĉiujn atendas pereco, kaj kune kun ni pereos la gloro de la Ŝafido.

La laboristo rigardis lin kun grandega maltrankvilo, kvazaŭ ne konsciigante al si tion, kion li aŭdis, kaj la greko, kovrinte la kapon per la rando de sia mantelo, komencis ripeti per voĉo, kvazaŭ venanta el sub la tero:

— Ve al vi, servantoj de la vera Dio, ve al vi, kristanoj kaj kristaninoj!

Kaj denove sekvis silento, denove oni aŭdis nur la bruon de la muelŝtonoj, obtuzan kantadon de la muelistoj kaj murmuradon de la rivero.

— Patro, — demandis fine la laboristo, — kiu estas tiu perfidulo?

Ĥilono mallevis la kapon. Kiu estas tiu perfidulo? Filo de Judaso, filo de lia veneno, kiu ŝajnigas sin kristano kaj

vizitas la preĝodomojn nur por akuzi la fratojn antaŭ la imperiestro, ke ili ne volas konfesi la imperiestron, ke ili venenas fontanojn, murdas infanojn kaj volas detrui la Urbon tiel, ke ne postrestu ŝtono sur ŝtono. Jen post kelkaj tagoj estos ordonite al la pretorianoj, ke ili malliberigu ĉiujn maljunulojn, virinojn kaj infanojn kaj konduku ilin je pereco, same kiel oni kondukis je morto la sklavojn de Pedanio Sekundo. Kaj ĉion tion faris tiu dua Judaso. Sed se la unuan neniu punis, se neniu venĝis kontraŭ li, se neniu defendis Kriston en la horo de lia martirigo, kiu volos puni tiun ĉi perfidulon, kiu polvigos la serpenton, antaŭ ol la imperiestro lin elaŭskultos, kiu defendos de pereco la fratojn kaj la kredon je Kristo? Kaj Urbano, kiu ĝis tiam sidis sur la ŝtona ĉebordaĵo, leviĝis subite kaj diris:

— Mi tion faros, patro.

Ĥilono leviĝis ankaŭ, rigardis dum momento la vizaĝon de la laboristo, lumigitan de la lunbrilo, poste, etendinte la brakon, metis malrapide la manon sur lian kapon.

— Iru inter la kristanojn, — li diris solene, — iru en la preĝodomojn kaj demandu la fratojn pri Glaŭko, la kuracisto, kaj kiam oni montros lin al ci — en la nomo de Kristo, mortigu.

— Pri Glaŭko? Ripetis la laboristo, kvazaŭ volante fiksi tiun nomon en sia memoro.

— Ĉu ci konas lin?

— Ne, mi ne konas. Miloj da kristanoj estas en la tuta Romo, kaj ne ĉiuj konas sin reciproke. Sed morgaŭ en Ostriano<sup>198</sup> kunvenos nokte la fratoj kaj fratinoj, ĉiuj senescepte, ĉar venis la granda apostolo de Kristo, kiu tie instruos, kaj la fratoj montros al mi Glaŭkon.

— En Ostriano? — demandis Ĥilono. — Tio ja estas ekster la urbaj pordegoj. La fratoj kaj ĉiuj fratinoj? Nokte? Ekster la pordegoj, en Ostriano?

— Jes, patro. Tio estas nia tombejo, inter la vojoj Salla kaj Nomentana. Ĉu ci ne sciis, ke tie instruos la granda apostolo?

— Mi ne estis hejme dum du tagoj, tial mi ne ricevis lian leteron kaj mi ne sciis, kie estas Ostriano, ĉar antaŭ nelonge mi venis el Korinto, kie mi administras la kristanan komunumon. Sed tiel estas! Kaj se Kristo tiel cin inspiris, iru nokte, mia filo, en Ostrianon, elserĉu tie inter la fratoj Glaŭkon kaj mortigu lin dum la reveno al la urbo, por kio pardonitaj estos al ci ĉiuj pekoj. Kaj nun paco estu kun ci.

— Patro ...

— Mi aŭskultas cin, servanto de la Ŝafido.

Sur la vizaĝo de la laboristo bildiĝis embarasiteco. Jen

<sup>198</sup> Latine *Ostriatum* — unu el la tombejoj en Romo.

antaŭ nelonge li mortigis homon, eble du homojn, kaj la instruo de Kristo malpermesas mortigi. Li ne mortigis ilin tamen por defendi sin mem, ĉar ankaŭ tio estas malpermesita! Li ne mortigis, Dio gardu, por profito ... La episkopo mem donis al li fratojn, ke ili lin helpu, sed mortigi li malpermesis, li tamen malgraŭvole mortigis, ĉar Dio punis lin per tro granda forto ... Kaj nun li ege pentas... La aliaj kantas ĉe la muelŝtonoj, sed li, malfeliĉa, pensas pri sia peko, pri la ofendo de la Ŝafido. Kiom li jam preĝis, kiom li ploris! Kiom li petis pardonon de la Ŝafido! Kaj ĝis nun li sentas, ke li ne pentis sufiĉe. Nun denove li promesis mortigi la perfidulon. Bone! Nur siajn ofendojn oni rajtas pardoni, do li mortigos lin, eĉ antaŭ la okuloj de ĉiuj fratoj kaj fratinoj, kiuj morgaŭ estos en Ostriano. Sed Glaŭko estu antaŭe kondamnita de la ĉefuloj de la frataro, de la episkopo aŭ de la apostolo. Mortigi ne estas malfacile, kaj mortigi perfidulon estas eĉ agrable, kiel mortigi lupon aŭ urson, sed se Glaŭko pereus senkulpe? Kiel preni sur sian konsciencon novan mortigon, novan pekon kaj novan ofendon de la Ŝafido?

— Por juĝo mankas tempo, mia filo, — respondis Ĥilono, — ĉar la perfidulo rekte el Ostriano iros al la imperiestro, en Ancion, aŭ rifuĝos en la domon de unu patricio, kies pagato li estas, sed jen mi donos al ci signon; kiam ci

montros ĝin post la mortigo de Glaŭko, tiel la episkopo, kiel la apostolo benos cian faron.

Dirinte tion, li eligis moneron, poste komencis serĉi ĉe sia zono tranĉilon, kaj trovinte ĝin, skrapis per la akraĵo sur la sesterco la signon de kruco kaj donis la moneron al la laboristo.

— Jen la verdikto je Glaŭko kaj signo por ci. Kiam, foriginte Glaŭkon el la mondo, ci montros ĝin al la episkopo, li absolvos al ci ankaŭ tiun antaŭan mortigon, kiun ci malgraŭvole plenumis.

La laboristo etendis la manon por preni la moneron, sed, havante tro freŝe en la memoro la unuan mortigon, li spertis kvazaŭ senton de timo.

— Patro, — li diris per preskaŭ petega voĉo, — ĉu ci prenas sur cian konsciencon tiun faron kaj ĉu ci mem aŭdis Glaŭkon perfidi la fratojn?

Ĥilono ekkomprenis, ke li devas prezenti iaajn pruvojn, diri iujn nomojn, ĉar alie en la koron de la grandegulo povas enŝteliĝi dubo. Kaj subite feliĉa penso ekbrilis en lia kapo.

— Aŭskultu, Urbano, — li diris, — mi loĝas en Korinto, sed mi devenas el Koso, kaj ĉi tie, en Romo, mi instruas la instruon de Kristo al unu servantino el mia patrujo, nomata Eŭniko. Ŝi servas kiel vestofaldistino en la domo de

amiko de la imperiestro, iu Petronio. Kaj en tiu domo mi aŭdis kiel Glaŭko devigis ŝin perfidi ĉiujn kristanojn, kaj krom tio promesis al alia konfidato de la imperiestro, Vinicio, ke li trovos al li inter la kristanoj junulinon.

En tiu li momento li interrompis kaj mirege rigardis la laboriston, kies okuloj ekbrilis subite, kiel okuloj de sovaĝa besto, kaj la vizaĝo alprenis la esprimon de terura kolerero kaj minaco.

— Kio estas al ci? — li demandis preskaŭ kun timo.

— Nenio, patro. Morgaŭ mi mortigos Glaŭkon!...

La greko eksilentis; post momento, preninte la laboriston je la ŝultroj, li turnis lin tiel, ke la lumo de la luno falu rekte sur lian vizaĝon, kaj komencis rigardi lin atente. Videble estis, ke Hilonono hezitas en la animo, ĉu demandi lin plu kaj igi ĉion malkaŝa, aŭ kontentiĝi ĉi-momente per tio, kion li eksciis aŭ divenis.

Fine tamen lia denaska singardemo venkis. Li ekspiris profunde, foje kaj refoje; poste, metinte denove la manon sur la kapon de la laboristo, demandis per solena kaj emfaza voĉo:

— Ĉe la sankta bapto oni ja donis al ci la nomon Urbano?

— Jes, patro.

— Paco do estu kun ci, Urbano.

## Ĉapitro 18<sup>a</sup>

Petronio al Vinicio:

*«Plorinda estas cia stato, carissime! Venero evidente konfuzis cian prudenton, cin senigis je la saĝo, memoro kaj kapablo pensi pri io ajn ekster amo. Tralegu iam tion, kion ci respondis al mia letero, kaj ci vidos, kiel cia menso indiferentiĝis al ĉio, kio ne estas Ligia, kiel ĝi nur pri ŝi okupiĝas, al ŝi senĉese revenas kaj rondflugas super ŝi, kva-zaŭ akcipitro super ĉasata rabaĵo. Ĵe Polukso! Trovu ŝin pli rapide; alie, se la fajro ne transformos cin en cindron, ci ŝanĝos cin en la egiptan Sfinkson, kiu, onidire, ekaminte la palan Izidon iĝis al ĉio surda, indiferenta kaj atendas nur nokton por povi rigardi la amatinon per la ŝtonaj okuloj. Trakuradu vespere, alivestite, la urbon, vizitadu kun cia filozofo la kristanajn preĝodomojn. Ĉio, kio vekas esperon kaj pasigas la tempon, estas laŭdinda. Sed, pro amikeco al mi, faru unu aferon: tiu Urso, la sklavo de Ligia, estas laŭdire eksterordinare forta homo, dungu do Krotonon kaj faradu la serĉojn triope. Tiel estos pli sendanĝere kaj pli prudente. La kristanoj, se apartenas al ili Pomponia Grecina kaj Ligia, ne estas verŝajne tiaj friponoj, kiaj oni ilin ĝenerale opinias, ili pruvis tamen*



ĉe la forkapto de Ligia, ke kiam la afero koncernas unu el ilia ŝafaro, ili scias ne ŝerci. Kiam ci ekvidos Ligian, mi scias, ke ci ne kapablos cin deteni kaj ekdeziros ŝin tuj forkonduki, sed kiel ci tion plenumos sole kun Ĥilonido? Krotono tamen cin helpos, se ŝin eĉ defendus dek tiaj ligioj, kiel tiu Urso. Ne lasu cin ekspluati de Ĥilono, sed por Krotono ne avaru monon. El ĉiuj konsiloj, kiujn mi povas al ci sendi, ĉi tiu estas la plej bona.

Ĉi tie oni jam ĉesis paroli pri la malgranda aŭgustino kaj pri tio, ke ŝi mortis pro sorĉo. Popea ankorau aludas ilin iafoje, sed la menson de Nerono okupas io alia; cetere, se estas vere, ke la dia aŭgustino estas denove graveda, tiam ankaŭ en ŝi la memoro pri tiu infano malaperos sen iaj postsignoj. Ni estas jam de dekkelkaj tagoj en Neapolo, aŭ, pli ĝuste, en Bajo. Se ci kapablas pensi pri io ajn, tiam la eĥoj pri nia restado ĉi tie devus atingi ciajn orelojn, ĉar la tuta Romo parolas sendube pri nenio alia. Ni do iris rekte en Bajon, kie unue atakis nin rememoroj pri la patrino kaj riproĉoj de la konscienco. Sed ĉu ci scias, al kio Ahenobarbo jam venis? Jen al tio, ke eĉ la patrinmortigo servas al li nur kiel temo por versaĵoj kaj lud-okazo de arlekene-tragikaj scenoj. Li sentis iam verajn riproĉojn de la konscienco nur tiom, kiom li estas malkuraĝulo. Nun, kiam li konvinkiĝis, ke la mondo estas, kia ĝi estas, sub liaj piedoj, kaj neniu dio venĝis

kontraŭ li, li nur ŝajnigas ilin, por kortuŝi la homojn per sia sorto. Fojfoje li saltleviĝas nokte, certigante, ke lin pelas Furioj, li vekas nin, rigardas post sin, alprenas la sintenon de aktoro ludanta la rolon de Oresto, kaj plie de aĉa aktoro, li deklamas grekajn versaĵojn kaj rigardas, ĉu ni lin admiras. Kaj ni, kompreneble, lin admiras! Kaj anstataŭ diri al li: „Iru dormi, arlekenaĉo!“ — ankaŭ ni agordiĝas al la tono de tragedio kaj defendas la grandan artiston de la Furioj.

Je Kastoro! Sendube atingis cin almenaŭ la famo, ke li prezentiĝos publike en Neapolo. Oni kunpeliĝis ĉiujn grekajn sentaŭgulojn el Neapolo kaj el la najbaraj urboj; ili plenigis la arenon per tiel malagrabaodoro de ajlo kaj ŝvito, ke mi dankis al la dioj, ke anstataŭ sidi en la unuaj vicoj, inter la aŭgustanoj, mi estis kun Nerono post la scenejo. Kaj ĉu ci kredos tion, ke li timis? Li vere timis. Li prenis kelkfoje mian manon kaj metis ĝin al sia koro, kiu batis efektive per pli rapida ritmo. Lia spirado iĝis mallonga, kaj en la momento, kiam estis tempo eniri, li paliĝis, kiel pergameno, kaj ŝvitaj gutoj kovris lian frunton. Li ja sciis tamen, ke en ĉiuj vicoj sidas pretaj pretorianoj, armitaj per bastonoj, per kiuj, se bezone, ili estis stimulontaj la fervoron. Sed ne estis bezone. Neniu aro da simioj el la ĉirkaŭaĵoj de Kartago scipovas tiel hurli, kiel hurlis tiu aĉularo. Mi diras al ci, ke laodoro de ajlo venis

*eĉ en la scenejon, kaj Nerono riverencis, premis la manojn al la koro, sendis mankisojn kaj ploris. Poste li enkuris inter nin, kiuj atendis post la scenejo, kiel ebria, vokante: „Kio estas ĉiuj triumfoj kompare kun ĉi tiu triumfo mia?“ Kaj tie la aĉularo ĉiam ankoraŭ hurlis kaj aplaudis, sciante, ke ĝi elaplaŭdas al si favoron, donacojn, festenon, loteriajn biletojn kaj novan spektaklon kun la imperiestro-arlekeno. Mi eĉ ne miras ilin, ke ili aplaudis, ĉar tion oni ĝis nun ne vidis. Li dume ripetadis ĉiumomente: „Jen kio estas la grekoj! Jen kio estas la grekoj!“ Kaj ŝajnas al mi, ke de tiu momento lia malamo al Romo kreskis ankoraŭ pli. Malgraŭ tio en Romon estas senditaj specialaj kurieroj kun sciigoj pri la triumfo, kaj ni atendas en la proksimaj tagoj dankesprimojn de la senato.*

*Tuj post la debuto de Nerono okazis ĉi tie stranga akcidento. Jen la teatro subite falis en ruinon, sed tiam, kiam la homoj jam estis elirintaj. Mi estis tie kaj ne vidis, ke oni eĉ unu kadavron eligus el sub la ruboj. Multaj, eĉ inter la grekoj, rigardas tion kiel koleron de la dioj pro la profanado de la imperiestra aŭtoritato, sed li, kontraŭe, asertas, ke tio estas favorsigno de la dioj, kiuj evidente ŝirmas per sia gardo lian kantadon kaj tiujn, kiuj lin aŭskultas. El tio sekvas oferdonoj en ĉiuj temploj kaj grandaj danksolenoj, kaj por li — nova kuraĝigo al la vojaĝo en Aĥajon. Antaŭ kelkaj tagoj li tamen*

*diris al mi, ke li timas, kion diros pri tio la Roma popolo kaj ĉu ĝi ne ekscitiĝos, tiel pro amo al li, ki- el pro maltrankvilo pri la disdonado de greno kaj pri la cirkludoj, kiujn ĝi povus perdi en la okazo de pli longa foresto de la imperiestro.*

*Ni veturas tamen en Beneventon por rigardi la ŝu- istajn luksaĵojn, per kiuj sin glorigos Vatinio, kaj de tie, zorgate de la diaj fratoj de Heleno<sup>199</sup> — en Grekujon. Koncerne min, mi rimarkis unu aferon, ke kiam oni estas inter homoj frenezaj, ankaŭ oni mem freneziĝas, kaj plie, oni trovas ian ĉarmon en frenezaĵoj. Grekujo kaj vojaĝo kun milo da citroj, triumfiro de Bakĥo meze de nimfoj kaj bakĥantinoj kronitaj per mirta verdaĵo, per folioj de vinberujo kaj lonicero, veturiloj kun aljungitaj tigroj, floroj, tirsoj<sup>200</sup>, laŭrokronoj, ekkrioj «evoe!»<sup>201</sup>, muziko, poezio kaj aplaŭdanta Grekujo — ĉio tio estas bona, sed ni havas ĉi tie ankoraŭ pli kuraĝ- ajn intencojn. Ni volus krei orientan, fabelan im- perion, regnon de palmoj, suno, poezio kaj de realo transformita en sonĝon, kaj de vivo transformita en unu volupton. Ni volus forgesi pri Romo, kaj la ĉefpunkton de la mondo loki ie inter Grekujo, Azio*

<sup>199</sup> *la diaj fratoj de Heleno* — Kastoro kaj Polukso.

<sup>200</sup> «**tirso 1** (mit.) Bastono, finiĝanta per pinfrukto kaj ĉirkaŭvolvita de he- dero kaj vitobranĉo, atributo de Bakĥo kaj Menadoj...» [NPIV] (lat. *thyrsus*).

<sup>201</sup> Ĝojkrio dum Bakĥa festo.

*kaj Egiptujo, vivi la vivon ne de homoj, sed de dioj, ne scii, kio estas ĉiutageco, vagi en oraj galerioj, sub la ombro de purpuraj veloj, tra Arĥipelago, esti Apolono, Oziriso kaj Baalo en unu persono, esti roza kun matenruĝo, esti ora kun la suno, esti arĝenta kun la luno, regi, kanti, revii ... Kaj ĉu ci kredas, ke mi, kies prudento valoras ankoraŭ sestercion, kaj la juĝo — ason, tamen ankaŭ mi lasas min forporti de tiuj fantazioj, kaj mi lasas min forportit tial ke, eĉ se ili estas neeblaj, ili estas almenaŭ grandaj kaj neordinaraj ... Tia imperio fabela estus tamen io, kio iam, post multaj jarcentoj, ŝajnus al homoj sonĝo. Kiam Venero ne prenas sur sin la formon de ia Ligia aŭ almenaŭ de tia sklavino kia Eŭniko, kaj se la vivon ne ornamas arto, tiam la ekzistado estas naŭza kaj ofte havas la vizaĝon de simio. Sed la Kuprobarba ne realigos siajn projektojn, eĉ nur tial, ke en tia fabela regno de poezio kaj Oriento ne estus loko por perfidoj, malnoblaĵoj kaj morto, dum en li sub la masko de poeto sidas aĉa aktoro, malsprita veturigisto kaj banala tirano.*

*Kaj intertempe ni mortigas homojn, se ili nin iel ĝenas. La kompatinda Torkvato Silano jam estas ombro. Li malfermis siajn vejnojn antaŭ kelkaj tagoj. Lekanio kaj Licinio kun timo akceptas la konsulajn oficojn, la maljuna Trazeo ne evitos morton, ĉar li kuraĝas esti honesta. Tigeleno ne sukcesis ĝis*

*nun havigi por mi la ordonon, ke mi malfermu miajn vejnojn. Mi estas ankoraŭ bezona, ne nur kiel elegantia arbiter, sed ankaŭ kiel homo, sen kies konsiloj kaj gusto la ekskurso en Aĥajon povus ne sukcesi. Ofte mi tamen pensas, ke pli aŭ malpli frue la fino devas esti tia, kaj ĉu ci scias, kion mi tiam deziras? Jen, ke la Kuprobarba ne ricevu tiun mian vazon el Murho<sup>202</sup>, kiun ci konas kaj admiras. Se en la momento de mia morto ci estos apud mi, mi donos ĝin al ci, se ci estos for, mi ĝin frakasos. Sed dume ni havas ankoraŭ antaŭ ni la ŝuistan Beneventon, la olimpan Grekujon kaj Faton, kiu difinas al ĉiu vojon nekonatan kaj ne-antaŭvideblan.*

*Restu en sano kaj dungu Krotonon, aŭ oni duafoje forrabos de ci Ligian. Hilonidon, kiam ci lin ne plu bezonos, sendu al mi, kie ajn mi estos. Eble mi faros el li alian Vatinion kaj eble konsuloj kaj senatanoj iam tremos antaŭ li, kiel ili tremas antaŭ la nuna kavaliro Aleno. Valorus ĝisvivi tiun spektaklon. Kiam ci reakiros Ligian, sciigu min pri tio, por ke mi oferu por vi ambaŭ paron da cigoj kaj paron da kolomboj en la ĉi-tiea ronda templeto de Venero. Iam mi vidis en sonĝo Ligian en ciaj brakoj, serĉanta ciajn kisojn. Zorgu ke la sonĝo estu aŭgura. Neniaj nuboj estu sur cia ĉielo, kaj se ili*

<sup>202</sup> Lat. *Murrha*, *Myrrha* estas nekonata loko orienta el kiu devenis iuj eksterodinare valoregaj vazoj kia la pokalo de Petronio.

*estos, havu ili la koloron kaj aromon de rozo. Restu en sano. Adiaŭ!»*

## Ĉapitro 19<sup>a</sup>

Apenaŭ Vinicio finis legi, en la bibliotekon mallaŭte sin enŝovis Ĥilono anoncita de neniuj, ĉar al la servistoj estis ordonite enlasi lin je ĉiu horo de tago kaj nokto.

— La dia patrino de cia grandanima praulo Eneo, — li diris, — estu al ci tiel favora, sinjoro, kiel al mi favora estis la dia filo de *Majo*<sup>203</sup>.

— Tio signifas? — demandis Vinicio, saltleviĝante de la tablo, ĉe kiu li sidis.

Ĥilono levis la kapon kaj diris:

— *Eŭreka!*<sup>204</sup>

La juna patricio tiel emociiĝis, ke dum longa tempo li ne povis eldiri eĉ vorton.

— Ĉu ci ŝin vidis? — li demandis fine.

— Mi vidis Urson, sinjoro, kaj mi parolis kun li.

— Kaj ci scias, kie ili sin kaŝis?

— Ne, sinjoro. Iu alia pro nura memamo komprenigus al la ligio, ke li divenis, kiu li estas, iu alia penus esplori

---

<sup>203</sup> **Majo** (lat. *Maja* ← gr. Μαΐα) — la plej aĝa el la Plejadoj, la patrino de Hermeso. Al ŝi estas dediĉita la monato *majo*.

<sup>204</sup> **Eŭreka!** (gr. Εύρηκα) — mi trovis!

de li, kie li loĝas, kaj aŭ ricevus pugnobaton, post kiu ĉiuj teraj aferoj iĝus al li indiferentaj, aŭ vekus malfidon de la grandegulo kaj kaŭzus tion, ke oni serĉus jam en la sama nokto alian kaŝejon por la fraŭlino. Mi tion ne faris, sinjoro. Sufiĉas al mi scii, ke Urso laboras apud Emporio, ĉe muelisto kiu sin nomas Demaso, kiel cia liberigito, sinjoro, kaj tio sufiĉas al mi tial, ke nun iu ajn el ciaj fidataj sklavo povas matene postiri lin kaj eltrovi ilian kaŝejon. Mi nur alportas al ci, sinjoro, la certecon, ke se Urso sin trovas ĉi tie, tiam ankaŭ la dia Ligia estas en Romo, kaj alian novaĵon, ke la hodiaŭan nokton ŝi estos preskaŭ certe en Ostriano...

— En Ostriano? Kie tio estas? — interrompis Vinicio, evidente volante tuj kuri al la indikita loko.

— Tio estas malnova hipogeo<sup>205</sup> inter la vojoj Sala kaj Nomentana. Tiu *pontifex maximus*<sup>206</sup> de la kristanoj, pri kiu mi menciis al ci, sinjoro, kaj kiun oni atendis multe pli malfrue, jam alvenis, kaj hodiaŭ nokte li baptos kaj instruos en tiu tombejo. Ili kaŝas sin kun sia instruo, ĉar kvankam ĝis nun estas neniam ediktoj, kiuj ĝin malpermesus, la popolo ilin malamas, do ili devas esti singardemaj.

<sup>205</sup> **hipogeo** [PIV] gr. ὑπόγειον — prahistoria aŭ antikva duone subtera tobo aŭ kultejo.

<sup>206</sup> *pontifex maximus* [pontifeks máksimus] (lat.) — ĉefpastro, plej altranga pastro.



Urso mem diris al mi, ke ĉiuj senescepte kunvenos hodiaŭ en Ostriano, ĉar ĉiu volas vidi kaj aŭdi tiun, kiu estis la unua disĉiplo de Kristo, kaj kiun ili nomas Sendito. Kaj ĉar la virinoj egale kun la viroj aŭskultas ĉe ili la instruojn, tial el la virinoj forestos eble sole Pomponia, ĉar ŝi ne povus pravigi antaŭ Aŭlo, adoranto de la malnovaj dioj, kial ŝi forlasas nokte la domon, tamen Ligia, kiu estas prizorgata de Urso kaj de la ĉefuloj de la komunumo, ho sinjoro, venos kun aliaj virinoj sendube.

Vinicio, kiu vivis ĝis nun kvazaŭ en febro, subtenate sole de la espero, nun, kiam tiu espero ŝajnis realiĝanta, eksentis subite tian senfortiĝon, kian sentas homo post superforta vojaĝo ĉe sia celo. Ĥilono rimarkis tion kaj decidis tion profiti.

— La pordegoj estas, vere, gardataj de ciaz sklavo, sinjoro, kaj la kristanoj certe tion scias. Sed ili ne bezonas la pordegojn. Ankaŭ Tiberio ilin ne bezonas, kaj kvankam de la rivero al tiuj vojoj estas malproksime, valoras longigi la iradon por vidi la «grandan apostolon». Cetere ili povas havi milojn da rimedoj por transiĝi ekster la muregojn. Kaj mi scias, ke ili havas rimedojn. En Ostriano ci trovos, sinjoro, Ligian, kaj eĉ se, kion mi ne supozas, ŝi forestus, estos tie Urso, ĉar li promesis al mi mortigi Glaŭkon. Li mem diris al mi, ke li ĉeestos, kaj ke li mortigos tie Glaŭ-

kon, ĉu ci aŭdas, nobla tribunuso? Nun, aŭ ci iros post li kaj ekscios, kie Ligia loĝas, aŭ ci ordonos al ciaj sklavoj kapti lin, kiel mortiginton, kaj havante lin en ciaj manoj, ci havigos de li konfeson, kie li kaŝis Ligian. Mi faris mian taskon! Iu alia, ho sinjoro, dirus al ci, ke li eltrinkis kun Urso dek kruĉojn da plej bona vino, antaŭ ol li havigis de li la sekreton; iu alia dirus al ci, ke li malgajnis mil sestercojn, ludante kun la ligio je *scriptæ duodecim*<sup>207</sup> aŭ ke li aĉetis la sekreton por du mil ... Mi scias, ke ci redonustion al mi duoble, sed malgraŭ tio, unu fojon en la vivo ... tio estas, mi volis diri: kiel ĉiam en la vivo, mi estos honesta, ĉar mi ne dubas, ke, kiel diris la grandanima Petro, ĉiujn miajn elspezojn kaj esperojn superos cia malavareco.

Sed Vinicio, kiu estis soldato kaj kutimis ne nur konservi kuraĝon en ĉiaj okazoj, sed ankaŭ agi, tuj ekregis la momentan malfortecon kaj diris:

— Ci ne elreviĝos pri mia grandanimeco, tamen antaŭe ci iros kun mi en Ostrionon.

— Mi, en Ostrionon? — demandis Ĥilono, kiu neniel deziris tien iri. — Mi, nobla tribunuso, promesis al ci trovi Ligian, sed mi ne promesis ŝin forkapti ... Pensu, sinjoro, kio okazus al mi, se tiu ligia urso, disŝirinte Glaŭkon, tuj

<sup>207</sup> Laŭvorte «12 linioj» — antikva formo de damludo.

ekpensos, ke ne tute prave li lin disŝiris? Ĉu li ne konsideros min (cetere malprave) la kaŭzinto de la plenumita murdo? Memoru, sinjoro, ke ju pli granda filozofa iu estas, des pli malfacilas al li respondi malsaĝajn demandojn de simpluloj; kion do mi al li respondu, se li demandos min, kial mi akuzis Glaŭkon la kuraciston? Se ci tamen suspektas, ke mi cin trompas, mi diros al ci: pagu al mi nur tiam, kiam mi montros al ci la domon, en kiu Ligia loĝas, kaj hodiaŭ montru al mi nur parteton de cia malavareco, por ke, se cin, sinjoro (de kio gardu ĉiuj dioj), trafus ia akcidento, mi ne restu tute sen rekompenco. Cia koro neniam tion elportus.

Vinicio alpaŝis al kesto, nomata *arca*,<sup>208</sup> staranta sur marmora bazo kaj, eliginte el ĝi sakon, ĵetis tiun al Ĥilono.

— Ĉi tie estas skriploj,<sup>209</sup> — li diris; — kiam Ligia estos en mia domo, ci ricevos samtiom da aŭroj.

— Jovo!!! — ekkriis Ĥilono.

Sed Vinicio kuntiris la brovojn.

— Ĉi tie oni donos al ci por manĝi, post kio ci povos ripozi. Ĝis la vespero ci ne forlasos la domon, kaj kiam

<sup>208</sup> Voĉlegu [arka].

<sup>209</sup> *Scrupulum* aŭ *scrupulum* (lat.) — malgranda ora monero, egala al triono da ora denaro, aŭ *aŭreo*. (Noto de la aŭtoro.)

(Alia latina nomo, *scriplus*, pli oportunas por esperantigo.)

noktiĝos, ci akompanos min en Ostrianon.

Sur la vizaĝo de la greko bildiĝis dum momento timo kaj hezito, poste li tamen trankviliĝis kaj diris:

— Kiu povas kontraŭstari al ci, sinjoro! Akceptu tiujn vortojn kiel bonan aŭguron, kiel la similajn akceptis nia granda heroo<sup>210</sup> en la templo de Amono. Koncerne min, ĉi tiuj skriploj (ĉi tion dirante, li skuis la sakon) superpezis miajn skrupulojn, ne parolante jam pri cia societo, kiu estas por mi feliĉo kaj ĝuo...

Sed Vinicio malpacience interrompis al li kaj komencis demandi pri detaloj de la interparolo kun Urso. Unu afero montriĝis klare el ili: nome, ke aŭ ili trovos la kaŝejon de Ligia ankoraŭ en tiu ĉi nokto, aŭ povos forkapti ŝin mem en la revenvojo el Ostriano. Kaj ĉe tiu penso Vinicio ekposedis supehoma ĝojo. Nun, kiam li havis la certecon, ke li reakiros Ligian, la kolero kaj la ofendosento, kiujn li havis kontraŭ ŝi, malaperis. Por tiu ĝojo li pardonis al ŝi ĉiujn kulpojn. Li pensis nur pri ŝi, kiel pri kara kaj dezirata persono, kaj li havis la impreson, kvazaŭ ŝi estus revenonta post longa vojaĝo. Li sentis la deziron kunvoki siajn sklavojn kaj ordoni al ili ornami la domon per girlandoj. En tiu momento eĉ kontraŭ Urso li ne koleris. Li pretis ĉion al ĉiuj pardoni. Ĥilono, al kiu ĝis nun, malgraŭ

<sup>210</sup> T.e. Aleksandro la Granda, kiu en la templo de Amono aŭdis profetaĵon pri siaj potenco kaj gloro.

la servoj de la greko, li sentis certan abomenon, la unuan fojon ekŝajnis al li homo amuza kaj kune neordinara. Lumiĝis lia domo, lumiĝis liaj okuloj kaj lumiĝis la vizaĝo. Li komencis denove senti la junecon kaj la plezuron de la vivo. Lia antaŭa malserena sufero ankoraŭ ne lasis lin sufiĉe mezuri, kiel li amis Ligian. Li ekkomprenis tion nur nun, kiam li esperis ŝin havi. La sopiro je Ligia vekigis nun en li, kiel printempe vekigas la tero varmigita de la suno, sed liaj deziresentoj estis nun kvazaŭ malpli blindaj kaj sovaĝaj, kvazaŭ pli ĝojaj kaj kortuŝaj. Li ankaŭ sentis en si energion sen limo kaj estis konvinkita, ke kiam li nur ekvidos Ligian per siaj okuloj, ŝin ne reprenos de li ĉiuj kristanoj de la tuta mondo, nek eĉ la imperiestro mem.

Ĥilono tamen, kuraĝigite de lia ĝojo, prenis la voĉon kaj komencis doni al li konsilojn. Laŭ li oni ne konsideru ankoraŭ la aferon gajnita kaj agu kun plej granda gardemo, sen kiu la tuta laboro povus iĝi senfrukta. Li ankaŭ petege admonis Vinicion, ke li ne forkaptu Ligian el Ostriano. Ili tien iru kun kapuĉoj sur la kapoj, kun vualitaj vizaĝoj kaj kontentiĝu per observado de ĉiuj ĉeestantoj el iu senluma angulo. Kaj kiam ili ekvidos Ligian, plej sendanĝere estos sekvi ŝin, vidi, en kiun domon ŝi eniras, kaj morgaŭ, je la tagiĝo, ĉirkaŭigi ĝin per amaso da sklavoj

kaj forpreni ŝin en luma tago. Ĉar ŝi estas garantiulino kaj apartenas ĝuste al la imperiestro, oni povas tion fari, ne timante la leĝan persekuton. En la okazo, se ili ŝin ne trovas en Ostriano, ili sekvos Urson kaj la efiko estos la sama. En la tombejon ili ne povas iri kun granda nombro da homoj, ĉar tio povus altiri al ili atenton, kaj tiam al la kristanoj sufiĉus nur estingi ĉiujn lumojn, kiel ili faris ĉe la unua forkapto, kaj disiĝi aŭ kaŝi sin en la mallumo, en kaŝejojn konatajn nur de ili mem. Aliflanke, ili devas sin armi kaj kio estas eĉ pli konsilinda, kunpreni du homojn fidindajn kaj fortajn, por eventuale havi ilin kiel defendantojn.

Vinicio konfesis lin tute prava kaj rememorante ankaŭ la konsilojn de Petronio, ordonis al siaj sklavoj, ke ili venigu al li Krotonon. Ĥilono, kiu konis ĉiujn en Romo, multe trankviliĝis, aŭdante la nomon de la fama atleta, kies superhoman forton li plurfoje admiris sur areno, kaj deklaris ke li iros en Ostrianon. La sako da aŭreoj ŝajnis al li pli facile akirebla kun la helpo de Krotono.

Li sidiĝis do kun esperplena menso al la tablo, al kiu post kelka tempo lin invitis la atriestro.

Dum la manĝado li rakontis al la sklavoj, ke li havigas al ilia mastro mirindan ŝmiraĵon, per kiu sufiĉas ŝmiri la hufojn de plej sentaŭgaj ĉevaloj, ke ili restigu malproksi-

me post si ĉiujn aliajn. Prepari tiun ŝmiraĵon instruis lin unu kristano, ĉar la kristanaj ĉefuloj estas multe pli lertaj en sorĉoj kaj mirakloj ol eĉ la tesalianoj, kvankam Tesalio famas pro siaj sorĉistinoj. La kristanoj havas al li grandegan fidon, kaj kial ili ĝin havas, facile divenos ĉiu, kiu scias, kion signifas la fiŝo. Tiel interparolante, li atente rigardis la vizaĝojn de la sklavoj, esperante, ke li eble malkovros inter ili kristanon kaj sciigos pri li al Vinicio. Kiam tamen tiu espero montriĝis vana li komencis manĝi kaj trinki treege abunde, ne avarante laŭdojn al la kuiristo kaj certigante, ke li klopodos aĉeti lin de Vinicio. Lian gajecojn konfuzis sole la penso, ke nokte li devos iri en Ostrianon, li konsolis sin tamen, ke li iros alivestite, en mallumo, kaj en la kompanio de du homoj, el kiuj unu, kiel fortegulo, estas idolo de la tuta Romo, kaj la alia — patricio kaj armea tribunuso. «Eĉ se ili rekonus Vinicion», li diris al si, «ili ne kuraĝos levi kontraŭ lin la manon; kaj koncerne min, ili estos saĝaj, se ili ekvidos eĉ la pinton de mia nazo».

Poste li komencis rememori la interparolon kun la laboristo kaj tiu rememorado lin plenigis je nova espero. Li havis neniun dubon, ke tiu laboristo estis Urso. Li sciis el rakontoj de Vinicio kaj de tiuj, kiuj estis transkonduktantaj Ligian el la imperiestra palaco, pri la eksterordinara

forto de tiu homo. Kaj ĉar ĉe Eŭrikio li demandis pri homoj escepte fortaj, estis nenio mirinda, ke oni montris al li Urson. Poste la konfuzo kaj ekscito de la laboristo ĉe la aludo pri Vinicio kaj Ligia ne lasis dubi, ke tiuj personoj speciale lin interesas; la laboristo menciis ankaŭ pri pento pro mortigo de homo, kaj Urso mortigis ja Atacenon; fine la aspekto de la laboristo tute konformis al tio, kion Vinicio rakontis pri la ligio. Sole la ŝanĝita nomo povis nur vekti dubon, sed Ĥilono jam sciis, ke la kristanoj ofte ricevas ĉe bapto novajn nomojn.

«Se Urso mortigos Glaŭkon», Ĥilono diris al si, «tiel pli bone estos, kaj se li ne mortigos, ankaŭ tio estos bona signo, ĉar ĝi pruvos, kiel malfacile estas al la kristanoj mortigi. Mi ja prezentis tiun Glaŭkon kiel propran filon de Judaso kaj perfidanton de ĉiuj kristanoj; mi estis tiel elokventa, ke ŝtono kortuŝiĝus kaj promesus fali sur la kapon de Glaŭko, tamen mi apenaŭ inklinigis tiun ligian urson, ke li promesu al mi meti sur lin sian manegon ... Li hezitis, ne volis, rakontis pri sia bedaŭro kaj pento. Probable inter ili tio ne konvenas ... Siajn proprajn ofendojn oni devas pardoni, venĝi la fremdajn oni ne tre rajtas, *sekve*, konsideru, Ĥilono, kio povas cin minaci? Glaŭko ne rajtas venĝi kontraŭ ci ... Urso, se li ne mortigos Glaŭkon por tiel granda kulpo, kiel perfido de ĉiuj kristanoj, tiom pli



ne mortigos cin por kulpo tiel malgranda, kiel perfido de unu kristano. Cetere, kiam mi foje montros al tiu voluptama virkolombo la neston de tiu turtino, mi lavos la manojn for de ĉio kaj translokiĝos ree en Neapolon. Ankaŭ la kristanoj parolas pri ia forlavo de la manoj, tio estas do videble maniero, en kiu, se oni havas kun ili aferon, oni povas ĝin finfine solvi. Bonaj homoj estas tiuj kristanoj, kaj tiel malbone oni parolas pri ili! Ho dioj! Tia estas la justeco en la mondo. Plaĉas al mi tamen tiu instruo, ĉar ĝi ne permesas mortigi. Sed se ĝi ne permesas mortigi, ĝi certe ankaŭ ne permesas ŝteli, nek trompi, nek false atesti, sekve mi ne povas diri, ke ĝi estas facila. Ĝi instruas evidente ne nur honeste morti, kiel instruas la stoikistoj, sed ankaŭ honeste vivi. Se mi akiros iam riĉaĵojn kaj havos tian domon, kiel ĉi tiu, kaj tiom da servistoj, eble ankaŭ mi iĝos kristano por tiel longe, kiel tio estos al mi oportuna. Ĉar riĉulo povas ĉion permesi al si, eĉ virton ... Jes!! Tio estas religio por riĉuloj, kaj tial mi ne komprenas, kiamaniere estas inter ili tiom da malriĉuloj. Kion ili profitas el tio kaj kial ili permesas, ke la virto ligu iliajn manojn? Mi devos iam prikonsideri tion. Dume gloron al ci, Hermeso, ke ci helpis al mi retrovi tiun melon ... Sed se ci tion faris por la du bovidinoj, blankaj samaĝulinoj kun orumitaj kornoj, en tiu okazo mi ne rekonas cin. Hontu,

Argusmortiginto!<sup>211</sup> Tia saĝega dio — kiel ci ne antaŭvidis de la komenco, ke ci nenion ricevos! Anstataŭe mi ofertas al ci mian dankon; kaj se ol mian dankon ci preferas du brutojn, tiam ci mem estas la tria, kaj en plej bona okazo, ci devus esti paŝtisto, ne dio. Gardu cin ankaŭ, ke mi ne pruvu al la homoj, ke ci ne ekzistas, ĉar tiam ĉiuj ĉesus oferdonadi al ci. Kun filozofoj oni prefere vivu en paco.»

Tiel parolante kun si mem kaj kun Hermeso, li etendiĝis sur benko, submetis sian mantelon sub la kapon kaj, kiam la sklavoj forprenis la manĝovazojn, li endormiĝis. Li vekigis, aŭ pli ĝuste oni vekis lin, kiam alvenis Krotono. Tiam li iris en la atrion kaj kun plezuro komencis rigardi la potencan figuron de la luktomajstro, eksgladiatoro, kiu per sia grandeco ŝajnis plenigi la tutan atrion. Krotono jam estis interkonsentinta pri la prezo de la entrepreno kaj ĝuste li parolis al Vinicio:

— Je Herkulo! Bone, Sinjoro, ke ci turnis cin al mi hodiaŭ, ĉar morgaŭ mi iros en Beneventon, kien invitis min la nobla Vatinio, por ke mi tie antaŭ la imperiestro laktu kun Sifako, la plej forta negro, kiun iam naskis Afriko. Ĉu ci imagas, sinjoro, kiel lia vertebraro krakos en miaj brakoj, sed krom tio mi frakasos per pugno lian nigran makzelon.

<sup>211</sup> Nomepیتeto de Hermeso, kiu mortigis la centokulan giganton Arguso.

— Je Polukso! — respondis Vinicio. — Mi estas certa, ke ci tion faros, Krotono.

— Kaj ci bonege agos, — aldonis Ĥilono. — Jes!... Krom tio frakasu lian makzelon! Tio estas bona ideo kaj inda je cia faro. Mi pretas veti, ke ci frakasos lian makzelon. Dume tamen olivoleu ciajn membrojn, mia Herkulo, ĉar sciu tion, ke kun vera Kako<sup>212</sup> vi povas renkontiĝi. La homo, gardanta la fraŭlinon, kiun serĉas la nobla Vinicio, posedas laŭdire eksterordinaran forton.

Ĥilono parolis tiel nur por eksciti la ambicion de Krotono, sed Vinicio diris:

— Jes, mi ne vidis tion, sed oni rakontis al mi pri tiu ligio, ke kaptinte virbovon je la kornoj, li povas ĝin treni, kien li volas.

— Ho! — ekkriis Ĥilono, kiu ne imagis, ke Urso povis esti tiel forta.

Sed Krotono ridetis malestime.

— Mi devigas min, nobla sinjoro, forkapti per ĉi tiu mano kiun ci ordonos, per la alia defendi min kontraŭ septiaj ligioj kaj alporti la fraŭlinon en cian domon, eĉ se ĉiuj kristanoj de la tuta Romo postkuros min, kiel kalabriaj lupoj. Se mi tion ne sukcesos, mi lasos min skurĝi ĉe tiu ĉi pluvujo.

<sup>212</sup> Gr. Κάκος → lat. *Cacus* — en malnovgreka mito, monstra giganto spuitanta fajron kaj fumon, filo de Hefesto kaj Gorgono Meduzo.

— Ne permesu al li tion, sinjoro! — ekkriis Ĥilono. — Oni komencos ĵeti ŝtonojn sur nin, kaj tiam kion helpos lia tuta forto? Ĉu ne estos pli bone forpreni la fraŭlinon el la domo kaj riski pereon nek por ŝi, nek por ni mem?

— Tiel estu, Krotono, — diris Vinicio.

— Cia mono, cia volo! Memoru nur, sinjoro, ke morgaŭ mi veturos en Beneventon.

— Mi havas kvincent sklavojn en la urbo mem, — respondis Vinicio.

Poste li donis al ili signon, ke ili foriĝu, iris mem en la bibliotekon kaj sidiĝinte, skribis al Petronio la sekvantajn vortojn:

*«Ĥilono trovis Ligian. Hodiaŭ vespere mi iros kun li kaj kun Krotono en Ostrianon kaj forkaptos ŝin tuj, aŭ morgaŭ el la domo. La dioj verŝu sur ĉi ĉiajn bonojn. Restu en sano, carissime, ĉar la ĝojo ne lasas min skribi plu.»*

Kaj formetinte la kanon li komencis promeni per rapidaj paŝoj, ĉar krom la ĝojo, kiu plenplenigis lian animon, konsumis lin febro. Li diris al si, ke la morgaŭan tagon Ligia estos en tiu ĉi domo. Li ne sciis, kiel li agos kun ŝi, li tamen sentis, ke se ŝi volos lin ami, li estos ŝia sklavo. Li rememoris la certigojn de Akteo, ke li estis amata, kaj kortuŝiĝis ĝisfunde. Do la afero konsistos nur en subpre-

mo de ia virgulina honto kaj de iaj ĵuroj, kiujn videble ordonas la kristana instruo? Sed se tiel estas, do, kiam Ligia foje troviĝos en lia domo kaj subiĝos al persvado aŭ perforto, tiam ŝi devos diri al si: «tio fariĝis!» kaj poste estos jam cedema kaj amanta.

Eniro de Ĥilono interrompis tamen la fluadon de tiuj dolĉaj pensoj.

— Sinjoro, — diris la greko, — jen kio venis ankoraŭ en mian kapon: eble la kristanoj havas iajn *teserojn*<sup>213</sup>, sen kiuj neniu estos enlasita en Ostrionon? Mi scias, ke en la preĝodomoj tiel okazas kaj tian *teseron* mi ricevis de Eŭrikio; permesu do, ke mi iru al li, sinjoro, informiĝu precize kaj provizu nin per tiuj signoj, se ili montriĝos necesaj.

— Bone, nobla saĝulo, — respondis gaje Vinicio, — ci parolas, kiel prudenta homo kaj meritas pro tio laŭdon. Iru do al Eŭrikio, aŭ kien plaĉas al ci, sed kiel garantion lasu sur tiu ĉi tablo la sakon, kiun ci ricevis.

Ĥilono, kiu ĉiam malvolonte disiĝis de mono, ekgrimacis, li konformiĝis tamen al la ordono kaj eliris. De Karinoj al la Cirko, apud kiu situis la butiko de Eŭrikio, ne estis tre malproksime, tial li revenis longe antaŭ la vespero.

— Jen estas la signoj, sinjoro. Sen ili oni nin ne enlas-

<sup>213</sup> *tesero*, latine *tessera* — tabuleto, kubeto ktp uzata kiel ĵetono, enira bileto, rekonilo.

us. Mi ankaŭ bone informiĝis pri la vojo, kaj samtempe diris al Eŭrikio, ke mi bezonas la signojn nur por miaj amikoj kaj mem mi ne iros, ĉar tio estas por mi tro malproksime, fine ke morgaŭ mi vidos la grandan apostolon, kiu ripetos al mi la plej belajn fragmentojn el sia parolado.

— Kiel do: ci ne iros? Ci devas iri! — diris Vinicio.

— Mi scias, ke mi devas, sed mi iros bone kapuĉkovrita, kaj mi konsilas al vi fari la samon, aŭ ni povas fortimigi la birdojn.

Baldaŭ efektive ili komencis sin prepari, ĉar ekstere jam iĝis krepusko. Ili prenis gaŭlajn mantelojn kun kapuĉoj, ili prenis lanternojn; krome Vinicio armis sin mem kaj siajn kunulojn per mallongaj, kurbaj ponardoj. Ĥilono, plie, surmetis perukon, per kiu li provizis sin envoje al Eŭrikio, kaj ili eliris, rapidante por atingi la malproksiman pordegon Nomentanan ankoraŭ antaŭ ĝia fermo.

## Ĉapitro 20<sup>a</sup>

Ili iris tra la strato Patricia, laŭlonge de Viminalo<sup>214</sup>, al la iama Viminala pordego, apud la ebenaĵo, kie poste Diodokleciano konstruigis grandiozajn vaporbanejojn. Ili preterpasis la restaĵojn de la murego de Servio Tulio kaj tra lokoj jam pli malplenaj atingis la vojon Nomentanan; poste, direktinte sin dekstren al la Salaria, troviĝis inter montetoj plenaj je sabloprenejoj, kaj ialoke de tomboj.

Intertempe iĝis tute mallume, kaj ĉar la luno ankoraŭ ne leviĝis, estus al ili sufiĉe malfacile trovi la vojon, se, kiel antaŭvidis Ĥilono, ne montrus ĝin la kristanoj mem.

Efektive — dekstre, maldekstre kaj antaŭe oni vidis malhelajn figurojn, singarde rapidantajn al la sablaj kavegoj. Kelkaj el tiuj homoj portis lanternojn, kovrante ilin tamen laŭeble per la manteloj; aliaj, pli bone konantaj la vojon, iris en mallumo. La ekzercitaj okuloj de Vinicio distingis laŭ la movoj pli junajn virojn disde maljunuloj, sin trenantaj kun helpo de bastonoj, kaj de virinoj, zorgeme envolvitaj en longajn stolojn. Maloftaj pasantoj kaj kamparanoj, reveturantaj el la urbo, konsideris videble tiujn noktajn migrantojn kiel laboristojn, rapidantajn al la

---

<sup>214</sup> Latine *collis Viminalis* — la plej malgranda el la 7 klasikaj montetoj de Romo, inter Kvirinalo kaj Eskvilino.

sablofosejoj, aŭ kiel membrojn de enterigaj korporacioj, kiuj fojfoje aranĝadis inter si bankedojn en nokto. Laŭgrade tamen, kiel la juna patricio kaj liaj kunuloj antaŭeniĝadis, ĉirkaŭe flagris ĉiam pli multaj lanternoj kaj grandiĝadis la nombro de la personoj. Kelkaj el ili kantis per mallaŭtaj voĉoj kantojn, kiuj ŝajnis al Vinicio kvazaŭ plenaj je sopiro.

Iafoje atingis lian orelon apartaj vortoj aŭ frazoj, kiel ekzemple: «Leviĝu ci, kiu dormas» aŭ «Leviĝu el mortintoj», alifoje la nomo de Kristo ripetiĝadis en la buŝoj de la viroj kaj virinoj. Sed Vinicio malmulte atentis la vortojn, ĉar lian kapon trakuris la penso, ke eble iu el tiuj malhelaj figuroj estas Ligia. Kelkaj, preterpasante proksime, diris: «Paco kun vi!» aŭ «Gloro al Kristo!» kaj lin ekregadis maltrankvilo kaj lia koro ekbatadis pli forte, ĉar ŝajnis al li, ke li aŭdas la voĉon de Ligia. Similaj figuroj aŭ similaj movoj erarigadis lin en la mallumo ĉiumomente, kaj nur konvinkiĝinte kelkfoje pri sia eraro, li komencis ne fidi al la okuloj.

La vojo al li ŝajnis longa. La ĉirkaŭaĵon li konis bone, sed en la mallumo li ne povis tie orientiĝi. Ĉiumomente ili trafadis jen iajn mallongajn pasejojn, jen partojn de muroj, jen iajn konstruaĵojn, kiujn li ne memoris apud la urbo. Fine la rando de la luno aperis el super amasiĝintaj



omboj kaj prilumis la ĉirkaŭaĵon pli bone ol la flagrantaj lanternoj. Io komencis fine brili de malproksime, kvazaŭ fajro aŭ flamo de torĉo. Vinicio sin klinis al Ĥilono kaj demandis, ĉu tio estas Ostriano. Ĥilono, kiun la nokto, la malproksimeco de la urbo kaj tiuj figuroj, similaj al fantomoj, videble forte impresis, respondis per iom necerta voĉo:

— Mi ne scias, sinjoro, neniam mi estis en Ostriano. Sed ili ja povus glori sian Kriston ie pli proksime al la urbo.

Kaj post momento, sentante la bezonon paroli kaj pli fortigi sian kuraĝon, li aldonis:

— Ili kunvenas, kiel rabistoj, kaj tamen ne estas al ili permesite mortigi, se nur tiu ligio ne trompis min malinde.

Ankaŭ Vinicion, malgraŭ ke li pensis pri Ligia, mirigis tiu singardemo kaj sekreteco, kun kiu ŝiaj samkonfesantoj kunvenis por aŭskulti sian ĉefpastron; li do diris:

— Kiel ĉiuj religioj, ankaŭ ĉi tiu havas inter ni siajn simpatiulojn, sed la kristanoj estas ja juda sekto. Kial ili kunvenas ĉi tie, se en Transtibero staras judaj temploj, kie en plenuma tago la judoj faras oferdonojn?

— Ne, sinjoro. La judoj estas ĝuste iliaj plej grandaj malamikoj. Oni diris al mi, ke jam antaŭ la hodiaŭa impe-

riestro okazis preskaŭ milito inter la judoj kaj ili. La imperiestron Klaŭdion tiel tedis tiuj maltrankviloj, ke li ekzilis ĉiujn judojn, nun tamen la edikto estas nuligita. Sed la kristanoj kaŝas sin de la judoj kaj de la popolo, kiu, kiel ci scias, atribuas al ili krimojn kaj malamegas ilin.

Dum kelka tempo ili iris en silento, post kio Hîlono, kies timo kreskis laŭmezure kiel ili malproksimiĝadis de la urbo, diris:

— Revenante de Eŭrikio, mi pruntis ĉe unu barbiro perukon kaj metis en la nazon du fabojn. Ili ne devus min rekoni. Kaj eĉ se ili rekonos, ili min ne mortigos. Ili ne estas malbonaj homoj! Ili eĉ estas tre honestaj homoj, kiujn mi amas kaj estimas.

— Ne favorigu ilin al ci antaŭtempe per laŭdoj, — respondis Vinicio.

Ili eniris nun mallarĝan fosaĵon, fermitan deflanke kvazaŭ per du remparoj, kiujn unuloke transsaltis akvedukto. La luno elŝovis sin dume de post la nuboj kaj ĉe la fino de la fosaĵo ili ekvidis muron, abunde kovritan de hereroj, arĝente brilantaj en la lunlumo. Tio estis Ostriano.

La koro de Vinicio ekbatis pli vive.

Ĉe la pordego du fosistoj forprenadis la signojn. Post momento Vinicio kaj liaj kunuloj troviĝis en spaco sufiĉe vasta, de ĉiuj flankoj fermita de muro. Kelkloke staris tie

apartaj monumentoj, kaj en la mezo oni vidis la hipogeon mem, aŭ kripton, kuŝantan per sia suba parto sub la tersupraĵo, en kiu estis la tomboj; antaŭ la eniro en la kripton plaŭdis fontano. Estis tamen evidente, ke tre granda nombro da personoj ne povus lokiĝi ene de la hipogeo, Vinicio do facile divenis, ke la rito okazos sub la libera ĉielo, en la korto, kie baldaŭ kunvenis tre multenombra amaso.

Kien ajn la okulo povis atingi, ĉie lanterno flagris apud lanterno, kvankam multaj el la venintoj tute ne havis lumon. Krom kelkaj kapoj ĉiuj, ĉu timante perfidulojn, aŭ malvarmon, restis kapuĉkovritaj, kaj la juna patricio kun maltrankvilo pensis, ke se ili restos tiel ĝis la fino, tiam en tiu amaso, ĉe tiu malforta lumo, neeble estos por li rekoni Ligian.

Sed subite ĉe la kripton oni bruligis kelkajn peĉtorĉojn, kiujn oni kunmetis en malgrandan ŝtiparon. Iĝis pli lume. La amaso komencis post momento kanti, unue mallaŭte, poste pli laŭte, ian strangan himnon. Vinicio neniam en la vivo aŭdis similan kanton. Tiu sama sopiro, kiu jam frapis lian atenton en la kantoj duonvoĉe sonigataj de unuopaj homoj envoje al la tombejo, reaŭdiĝis ankaŭ nun en tiu himno, nur multe pli klare kaj pli forte, ĝis fine ĝi iĝis tiel korskua kaj grandega, kvazaŭ kune kun la homoj komen-

cus sopiri tiu tuta tombejo, la montetoj, fosaĵoj kaj ĉirkaŭaĵo. Povis ŝajni ĉe tio, ke estas en ĝi ia vokado en nokto, ia humila peto pri savo en vojperdo kaj mallumo.

La kapoj, levitaj supren, ŝajnis vidi iun malproksime, alte, kaj la manoj — alvoki, ke li venu malsupren. Kiomfoje la kanto eksilentis, sekvis kvazaŭ momento da atendo, tiel korskua, ke eĉ Vinicio kaj liaj kunuloj malgraŭvole rigardis al la steloj, kvazaŭ timante, ke okazos io eksterordinara kaj ke vere iu malsuprenvenos.

En Anatolio, en Egiptujo kaj en Romo mem Vinicio vidis multegajn diversajn templojn, ekkonis multegajn religiojn kaj aŭdis multegajn kantojn, tamen nur ĉi tie li unuafoje ekvidis homojn alvoki sian dion per kanto netial, ke ili volis plenumi per tio fiksitan riton, sed el la koro, el tia vera sopiro al li, kian povas havi infanoj al sia patro aŭ patrino. Oni devus esti blinda por ne rimarki, ke tiuj homoj ne nur adoris sian dion, sed ankaŭ amis lin tutanime, kaj tion Vinicio vidis ĝis nun en neniuj lando, en neniuj ritoj, en neniuj templo, ĉar en Romo kaj en Grekujo tiuj, kiuj observis ankoraŭ la kulton al la dioj, faris tion por sekurigi al si ilian helpon, aŭ pro timo, sed al neniuj eĉ venis en la kapon, ke oni povus ilin ami.

Kvankam lia penso estis okupita pri Ligia, kaj serĉado de ŝi meze de la amaso absorbis lian atenton, li ne povis

tamen ne vidi tiujn strangajn kaj eksterordinarajn aferojn, kiuj okazis ĉirkaŭe. Dume oni alĵetis kelkajn torĉojn al la fajro, kiu verŝis ruĝan lumon sur la tombejon, malfortigante la briladon de la lanternoj, kaj en tiu sama momento el la hipogeo eliris maljunulo, vestita per mantelo kun kapuĉo, sed kun malkovrita kapo, kaj surpaŝis ŝtonon, kuŝantan proksime al la ŝtiparo.

La amaso sin ekbalancis ĉe lia vido. Voĉoj apud Vinicio komencis flustri: «Petro! Petro!». Iuj surgenuiĝis, aliaj etendis al li la brakojn. Sekvis silento tiel profunda, ke oni aŭdis ĉiun karbopeceton, falantan de la torĉoj, malproksiman radbruon de la Nomentana vojo kaj murmuradon de vento en kelkaj pinioj, kreskantaj apud la tombejo.

Ĥilono klinis sin al Vinicio kaj flustris:

— Jen li! La unua disĉiplo de Kristo, la fiŝkaptisto!

La maljunulo levis supren la manon kaj per signo de kruco benis la kunvenintojn, kiuj tiufoje falis sur la genuojn. La kunuloj de Vinicio kaj li mem, ne volante sin perfidi, sekvis la ekzemplon de la aliaj. La juna viro komence ne povis konsciigi al si siajn impresojn, ĉar ŝajnis al li, ke tiu figuro, kiun li vidis antaŭ si, estas kune sufiĉe simpla kaj eksterordinara, kaj plie, ke tiu eksterordinar eco venas ĝuste el ĝia simpleco. La maljunulo havis nek mitron sur la kapo, nek kverkfolian kronon ĉirkaŭ la tem-

pioj, nek palmon en la mano, nek oran tabulon sur la brusto, nek veston stelbroditan aŭ blankan, unuvorte nenium el tiuj insignoj, kiujn portadis pastroj orientaj, egiptaj, grekaj aŭ romaj.

Kaj denove frapis Vinicion tiu sama diferenco, kiun li sentis, aŭskultante la kristanajn kantojn, ĉar ankaŭ tiu «fiŝkaptisto» ekŝajnis al li ne ĉefpastro, lerta en ceremonioj, sed kvazaŭ simpla, aĝa kaj treege respektinda atestanto, kiu venas de malproksime por rakonti pri iu vero, kiun li vidis, kiun li tuŝis, kiun li ekkredis, kiel oni kredas evidentaĵon, kaj ekamis ĝuste pro tio, ke li ekkredis. Estis ankaŭ en lia vizaĝo tia forto de konvinko, kian posedas la vero mem. Kaj Vinicio, kiu, estante skeptikulo, ne volis subiĝi al lia ĉarmo, subiĝis tamen al ia febra scivolo, kio do elfluos el la buŝo de tiu kunulo de la mistera «Ĥresto» kaj kia estas tiu instruo, kiun konfesas Ligia kaj Pomponia Grecina.

Dume Petro komencis paroli kaj parolis unue kiel patro, kiu admonas siajn infanojn kaj instruas, kiel ili devas vivi. Li ordonis al ili, ke ili rezignu luksojn kaj voluptojn, ke aliflanke ili amu malriĉecon, ĉastajn morojn, veron, ke ili elportadu pacience maljustaĵojn kaj persekutojn faratajn al ili, obeu siajn estrojn kaj ĉefulojn, sin gardu de perfido, hipokriteco kaj klaĉemo, kaj fine, ke ili donadu

ekzemplon tiel unu al alia inter si, kiel eĉ al la idolanoj.

Vinicion, por kiu estis bona ĉio, kio povus revenigi al li Ligian, kaj malbona ĉio, kio disigus ilin kiel baro, ofendis kaj kolerigis kelkaj el tiuj konsiloj, ĉar ŝajnis al li, ke rekomendante ĉastecon kaj batalon kontraŭ la voluptodeziroj, tiu maljunulo aŭdacas per tio ne nur mallaŭdi lian amon, sed malinklinigas Ligian de li kaj ŝin konfirmas en la kontraŭstaro. Li ekkomprenis, ke se ŝi ĉeestas inter la kunvenintoj, se ŝi aŭskultas tiujn vortojn kaj prenas ilin en la koron, ŝi devas en tiu momento pensi pri li kiel pri malamiko de ĉi tiu instruo kaj malnoblulo.

Ĉe tiu penso lin kaptis kolero: «Kion do novan mi aŭdis?», li diris al si. «Ĉu tio ĉi estas do tiu nekonata instruo? Ĉiu tion scias, ĉiu tion aŭdis. Malriĉecon kaj limigon de la bezonoj rekomendas ja ankaŭ la cinikistoj, virton rekomendis ja ankaŭ Sokrato, kiel aferon malnovan, sed bonan; ja ĉiu ajn stoikisto, eĉ ia Seneko, posedanta kvincent citronlignajn tablojn, gloras moderecon, rekomendas veramon, paciencon en malbonsorto, firmecon en malfeliĉo, kaj ĉio tio estas jam kvazaŭ longe kuŝinta greno, kiun musoj manĝas, sed kiun homoj jam ne volas manĝi, ĉar pro malnoveco ĝi odoras ŝimon.»

Kaj krom koleron li spertis ankaŭ senton de elreviĝo, ĉar li esperis malkovron de nekonataj, sorĉaj misteroj kaj

atendis almenaŭ, ke li aŭdos iun retoron, mirigantan per sia elokvento; dume li aŭdis sole vortojn treege simplajn, tute senornamajn. Mirigis lin nur tiu silento kaj tiu profunda atento, kun kiu la amaso aŭskultis.

Sed la maljunulo parolis plue al tiuj homoj, ensorĉitaj per liaj vortoj, ke ili devas esti bonaj, humilaj, justaj, malriĉaj kaj puraj, ne por havi trankvilon dum la vivo, sed por post la morto vivi eterne en Kristo, en tia ĝojo, en tia gloro, florado kaj feliĉo, kiajn neniam iu atingis sur la tero.

Kaj nun Vinicio, kvankam malamike agordita antaŭ momento, ne povis ne rimarki, ke tamen estas diferenco inter la instruo de la maljunulo kaj tio, kion diris la cinikistoj, stoikistoj aŭ aliaj filozofoj, ĉar tiuj rekomendis bonon kaj virton kiel aferon prudentan kaj sole praktikan en la vivo, dum li promesis por tio senmortecon, kaj ne ian senvaloran senmortecon sub la tero, en enuo, vanteco kaj malpleno, sed grandiozan, egalan preskaŭ al la stato de la dioj. Li parolis pri tio, krome, kiel pri afero tute certa, do kontraŭ tia kredo la valoro de virto iĝadis simple senlima, kaj la sortobatoj de la vivo aperis kiel io senkompare malgrava, ĉar suferi dum momento por senmezura feliĉo estas tute alia afero ol suferi nur tial, ke tia estas la ordo de la naturo. Sed la maljunulo parolis plu, ke virton kaj ve-



ron oni devas ami pro ili mem, ĉar la plej alta bono kaj pratempa virto estas Dio; tial kiu ilin amas, tiu amas Dion kaj pro tio mem iĝas lia amata infano.

Vinicio ne komprenis tion bone, li sciis tamen jam antaŭe el la vortoj, kiujn Pomponia Grecina diris al Petro-nio, ke tiu Dio estas laŭ la konvinko de la kristanoj unu kaj ĉiopova, kiam do nun li ekaŭdis ankoraŭ, ke li estas plejbono kaj plejvero,<sup>215</sup> li ekpensis malgraŭvole, ke kontraŭ tia Demiurgo<sup>216</sup> Jovo, Saturno, Apolono, Junono, Vesto kaj Venero aspektas kiel aĉa bando, en kiu misagas ĉiuj kune kaj ĉiu aparte. Sed plej granda mirego ekposedis la junan viron, kiam la maljunulo komencis instrui, ke Dio estas ankaŭ plejamo, kiu do amas la homojn, tiu plenumas ties plej altan ordonon. Ne sufiĉas tamen ami la homojn de sia nacio, ĉar Dio-homo por ĉiuj verŝis sian sangon kaj inter la idolanoj trovis jam tiajn siajn elektitojn, kia Kornelio la centuriestro; kaj ke ne sufiĉas ami tiujn, kiu bonfaras al ni, ĉar Kristo pardonis eĉ al la judoj, kiuj transdonis lin por ekzekuto, kaj al la romiaj soldatoj, kiuj alnajlis lin al la kruco; do al tiuj, kiuj agas al ni maljuste, oni ne nur pardonu, sed amu ilin kaj pagu al ili per bono

<sup>215</sup> La vortoj *ĉiopova*, *plejbono*, *plejvero*, *plejamo* respondas al pola serio kun la prefikso *wszech-*, simila al la latina *omni-*, kiu same konfuzas la ideojn pri «ĉio» kaj «plejo» (*omnipotent*; *omnibenevolence*).

<sup>216</sup> **demiurgo** [PIV], gr. *δημιουργός* — en la antikva filozofio, diaĵo kreinta la materian mondon.

por malbono; kaj ne sufiĉas ami bonulojn, sed oni amu ankaŭ malbonulojn, ĉar nur per amo oni povas elradikigi el ili la malbonon.

Ĥilono ĉe tiuj vortoj ekpensis, ke lia laboro estas vane perdita kaj ke Urso neniam en la vivo kuraĝos mortigi Glaŭkon, nek en ĉi tiu punkto, nek en iu alia. Li tamen tuj konsolis sin per alia konkludo, eltirita el la instruoj de la maljunulo: nome, ke ankaŭ Glaŭko ne mortigos lin, eĉ se Glaŭko lin malkovros kaj rekonos.

Vinicio ne plu opiniis, ke en la vortoj de la maljunulo estas nenio nova, sed kun mirego demandis sin mem: «Kia Dio tio estas? Kia instruo tio estas? Kio estas tiuj homoj?»

Ĉio, kion li aŭdis, neniel povis eniri lian kapon. Tio estis por li senekzempla turno de ideoj. Li sentis, ke se li, ekzemple, volus sekvi ĉi tiun instruon, li devus meti sur oferŝtiparon sian pensmanieron, kutimojn, karakteron, sian tutan ĝisnunan naturon, ĉion tion bruligi en cindron kaj sin plenigi je tute alia vivo kaj je tute nova animo. La instruo, kiu ordonis al li ami la partojn, sirianojn, grekojn, egiptojn, gaŭlojn kaj britojn, pardonu malamikojn, pagi al ili bonon por malbono kaj ami ilin, ekŝajnis al li freneza, sed samtempe li havis la senton, ke tamen en ĝia frenezeco mem estas io pli potenca ol en ĉiuj ĝisnunaj filozofioj.

Li ekpensis, ke pro sia frenezeco ĝi estas neplenumebla, kaj pro la neplenumebleco — dia. Li malakceptis ĝin en la animo; sed li sentis, ke eliĝas de ĝi, kvazaŭ de herbejo plena je floroj, kapturna odoro, kiun foje enspirinte, oni devas, kiel en la lando de la lotofagoj<sup>217</sup>, forgesi ĉion alian kaj nur al ĝi sopiri.

Ŝajnis al li, ke estas en ĝi nenio reala — kaj kune, ke kontraŭ ĝi la realo estas neatentinda vantaĵo. Malfermiĝis al li iaj spacoj, kiajn li ne antaŭdivenis, iaj gigantaĵoj, iaj nubegoj. La tombejo komencis lin impresi kiel kunveno de frenezuloj, sed ankaŭ kiel loko mistera kaj timinda, kie, kvazaŭ sur mistika kuŝejo, naskiĝas io, kio ĝis nun ne ekzistis en la mondo. Li rekonsciigis al si ĉion, kion de la unua momento la maljunulo parolis pri la vivo, vero, amo, Dio, kaj liaj pensoj blindiĝadis de brilo, kiel la okuloj blindiĝas de fulmoj senĉese sekvantaj unu alian.

Kiel ordinare homoj, kies vivo ŝanĝiĝis en unu pasion, li pensis pri ĉio tio tra sia amo al Ligia, kaj ĉe la lumo de tiuj briloj li klare ekvidis unu aferon: ke se Ligia ĉeestas en la tombejo, se ŝi konfesas tiun ĉi instruon, aŭskultas kaj sentas, neniam en la vivo ŝi iĝos lia amatino.

La unuan fojon de kiam li ekvidis ŝin ĉe Aŭlo, Vinicio eksentis, ke eĉ se tuj li ŝin retrovos, eĉ tiam ŝi restos por li

<sup>217</sup> *la lando de la lotofagoj* — en «Odiseado», lando kies enloĝantoj (Λωτοφάγοι) manĝis lotuson, kio kaŭzis forgeson.

perdita. Nenio simila venis ĝis nun en lian kapon; kaj eĉ nun li ne povis tion al si konsciigi, ĉar ĝi estis ne tiom klara kompreno, kiom malklara sento de iu neriparebla perdo kaj de iu malfeliĉo. Naskiĝis en li maltrankvilo, kiu tuj ŝanĝis sin en uraganon da kolero, kontraŭ la kristanoj ĝenerale kaj kontraŭ la maljunulo speciale. Tiu fiŝkaptisto, kiun unuarigarde li konsideris kiel simplulon, nun inspiris al li preskaŭ timon kaj ŝajnis al li esti ia mistera fato, decidanta senindulge kaj kune tragike pri lia sorto.

Fosisto denove almetis nerimarkeble kelkajn torĉojn al la fajro; la vento ĉesis murmuri en la pinioj; la flamo levis sin, rekte, en maldika kojno, al la steloj, brilantaj sur la belvetera ĉielo, kaj la maljunulo, rememorinte la morton de Kristo, komencis nur pri li paroli. Ĉiu haltigis la spiron en la brusto kaj la silento iĝis ankoraŭ pli granda ol antaŭe, tia, ke oni povis preskaŭ aŭdi la batadon de la koroj. Tiu homo vidis! Kaj li rakontis kiel iu, al kiu ĉiu momento tiel fiksiĝis en la memoro, ke, fermante la okulojn, li ankoraŭ vidas. Li rakontis do, kiel, veninte de la Kruco, li sidis kun Johano dum du tagoj kaj du noktoj en la ĝardeno, kiel ili restis tie ne dormante, ne manĝante, en doloro, timo, ĉagreno, tenante siajn kapojn per la manoj kaj pensante, ke Li mortis. Oh, aĥ! Kiel dolore estis! Kiel dolore! Jam la tria tago ekmatenis kaj la tagiĝo blankig-

is la urbajn murojn, kaj li kun Johano sidis tiel ĉe muro, senkonsilaj kaj senesperaj. Se nur dormo iafoje ilin kaptis (ĉar ankaŭ la nokton antaŭ la krucumo ili pasigis sendorme), tuj ili vekigis kaj komencis denove lamenti. Kaj apenaŭ la suno leviĝis, enkuris Maria el Magdalo, anhele, kun disligitaj haroj kaj kun la krio: «Oni forprenis la Sinjoron!» Kaj ili, ekaŭdinte ĉi tion, sin levis kaj ekkuris al la loko. Sed Johano, homo malpli aĝa, alkuris unua; li ekvidis la tombon malplena kaj ne kuraĝis eniri. Nur kiam ili estis trioje ĉe la eniro, li, kiu tion rakontas al ili, eniris, ekvidis sur la ŝtono la viŝtukon kaj la tolaĵojn, sed la korpon li ne trovis.

Do timo ilin ekregis, ĉar ili pensis, ke la pastroj forkaptis Kriston, kaj ambaŭ revenis hejmen en ankoraŭ pli granda aflikto. Poste alvenis aliaj disĉiploj kaj lamentis, jen ĉiuj kune, por ke pli facile ekaŭdu ilin la Sinjoro de Armeoj<sup>218</sup>, jen laŭvice. La spirito en ili duonmortis, ĉar ili esperis, ke la Majstro elaĉetos Izraelon, sed jen estis la tria tago, de kiam li mortis, do ili ne komprenis, kial la Patro forlasis la Filon, kaj ili preferus ne vidi la tagon kaj morti, tiel peza estis la ŝarĝo.

La rememoro pri tiuj teruraj momentoj ankoraŭ nun elpremis el la okuloj de la maljunulo du larmojn, kiujn

<sup>218</sup> Nomformo responda al «la Eternulo Cebaot» de la Londona Biblio (ekde 1Sam 1:3).

oni bone vidis ĉe la lumo de la fajro guti de la griza barbo. Lia maljuna kapo senhara komencis tremi, kaj la voĉo morthaltis en lia brusto. Vinicio diris al si interne: «Ĉi tiu homo parolas veron kaj ploras pro ĝi», kaj la simplakorajn aŭskultantojn kortuŝo kaptis je la gorgo. Ili aŭdis jam plurfoje pri la krucumo de Kristo kaj sciis, ke ĝojo sekvas la malĝojon, sed, ĉar tion rakontis la apostolo kiu vidis, tial sub la impreso ili plektis la manojn, plorĝemante, aŭ batis la brustojn.

Sed iom post iom ili trankviliĝis, ĉar venkis la deziro aŭskulti plu. La maljunulo duonfermis la okulojn, kvazaŭ volante pli bone vidi en la animo la malproksimajn aferojn, kaj daŭrigis:

«Dum ili tiel lamentis, denove enkuris Maria el Magdalo, kriante, ke ŝi vidis la Sinjoron. Ne povante pro grandega brilo lin rekoni, ŝi pensis, ke tio estas ĝardenisto, sed li diris: „Maria!“ Tiam ŝi ekkriis: „*Raboni!*“<sup>219</sup> kaj falis al liaj piedoj; li ordonis al ŝi iri al la disĉiploj, kaj poste malaperis. Sed ili, la disĉiploj, ne kredis al ŝi, kaj kiam ŝi ploris, iuj admonis ŝin, pensante, ke ŝia menso difektiĝis pro la ĉagreno, ĉar ŝi ankaŭ diris, ke ŝi vidis en la tombo anĝelojn, dum ili, alkurinte duafoje, vidis la tombon malplena. Poste vespere alvenis Kleopo<sup>220</sup>, kiu kune

<sup>219</sup> «Ŝi sin turnis, kaj diris al li Hebrelingve: Raboni; tio estas Majstro» [*Johno*, 20:16].

kun la aliaj iris en Emauson<sup>221</sup>, kaj ili revenis rapide, dirante: „Vere, la Sinjoro leviĝis el mortintoj“. Kaj ili komencis kontraŭparoli unu la alian ĉe la fermita pordo, timante la judojn. Subite li ekstaris inter ili, kvankam ne knaris la pordo, kaj kiam ili rigidiĝis, li diris al ili: „Paco kun vi!“»

.....

— Kaj mi vidis lin, kiel vidis lin ĉiuj, kaj li estis kiel lumo kaj kiel feliĉo de niaj koroj, ĉar ni ekkredis, ke li leviĝis el mortintoj kaj ke maroj sekiĝos, montoj ŝanĝiĝos en polvon, sed lia gloro ne pasos.

.....

— Kaj post ok tagoj Tomaso Didimo metis la fingrojn en liajn vundojn, tuŝis lian flankon, kaj poste falis al liaj piedoj kun ekkrio: „Mia Sinjoro kaj mia Dio!“ — al kio li respondis: „Ĉar ci ekvidis min, ci ekkredis. Benitaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen ekkredis“. Kaj ni aŭdis ĉi tiujn vortojn kaj niaj okuloj rigardis lin, ĉar li estis inter ni.

Vinicio aŭskultis kaj okazis al li io stranga. Li forgesis momente, kie li estas, li komencis perdi la senton de realo, mezurkapablon, juĝon. Li staris kontraŭ du neblaĵoj.

<sup>220</sup> Disĉiplo de Jesuo, greke Κλεόπας (Luko 24:18); eble grekigo de la aramea nomo ܚܦܝܠܦܐܝܘܨ

<sup>221</sup> Emauso [PIV] ← gr. Ἐμμαούς ← heb. עַמְאֻס — vilaĝo en Judujo (Luko 24:13–27).

Li ne povis kredi tion, kion diris la maljunulo, kaj sentis, ke oni devus esti ja blinda kaj malkonfesi la propran prudenton por supozi, ke tiu homo, kiu diris: «Mi vidis», mensogas. Estis io en lia kortuŝo, en liaj larmoj, en lia tuta sinteno kaj en la detaloj de la okazoj, kiujn li rakontis, kio faris ĉian suspekton ne ebla. Al Vinicio ŝajnis kelk-momente, ke li sonĝas. Sed ĉirkaŭe li vidis silentan amason, la fulgodoro de la lanternoj atingis lian nazon; je kelka distanco de li flamis la torĉoj kaj apude, sur la ŝtono, staris la maljuna homo, proksima al tombo, kun iom tremanta kapo, kiu, atestante per siaj vortoj, ripetis: «Mi vidis!»

Kaj li rakontis al ili ĉion pluan, ĝis la Ĉieleniro. Iafoje li ripozis, ĉar li parolis tre detale, sed oni sentis, ke ĉiu plej eta detalo tiel gravuriĝis en lia memoro, kiel sur ŝtono. La aŭskultantojn ekregis ekstazo. Ili forĵetis la kapuĉojn de la kapoj por aŭdi pli bone kaj por preterlasi neniun el tiuj vortoj, kiuj estis por ili senprezaj. Ŝajnis al ili, ke iu superhoma forto transportas ilin en Galileon, ke ili paŝas kune kun la disĉiploj en la tieaj boskoj kaj ĉe la akvobordoj, ke ĉi tiu tombejo sin ŝanĝas en la Tiberiadan lagon<sup>222</sup>, kaj sur la bordo, en matena nebulo, staras Kristo, kiel li staris tiam, kiam Johano, rigardante el la boateto, diris:

<sup>222</sup> Tiberiada lago [PIV] — granda nesalakva lago Galilea (Israelo), trafluita de Jordano.



«Jen la Sinjoro!» kaj Petro ĵetis sin naĝe, por pli rapide atingi la amatajn piedojn. En la vizaĝoj oni vidis ravitecon sen limoj kaj forgeson pri la vivo kaj feliĉon kaj senmezuran amon. Videble estis, ke dum la longa rakontado de Petro kelkaj havis viziojn, kaj kiam li komencis rakonti, kiel en la momento de la Ĉieleniro nubetoj komencis sin ŝovi sub la piedojn de la Savinto kaj kovri lin kaj kaŝi antaŭ la okuloj de la apostoloj, ĉiuj kapoj levis sin malgraŭvole al la ĉielo kaj sekvis momento kvazaŭ de atendo, kvazaŭ tiuj homoj esperus ekvidi lin ankoraŭ, kvazaŭ ili esperus, ke li malsuprenvenos reen el la ĉielaj kampoj por vidi, kiel la maljuna apostolo paŝtas la ŝafojn konfidentajn al li, kaj beni lin kaj lian ŝafaron.

Kaj por tiuj homoj ne ekzistis ĉi tiam Romo, ne ekzistis la furioza imperiestro, ne ekzistis temploj, dioj, idoloj, ekzistis nur Kristo, kiu plenigis la teron, la maron, la ĉielon, la mondon.

En malproksimaj domoj, disĵetitaj laŭlonge de la Vojo Nomentana, kokoj komencis krii, anoncante noktomezon. En tiu momento Ĥilono ektiris Vinicion je la rando de lia mantelo kaj ekflustris:

— Sinjoro, tie, proksime al la maljunulo, mi vidas Urbanon, kaj apud li fraŭlinon.

Vinicio rekonsciiĝis kvazaŭ vekite de dormo kaj, turn-

inte sin en la direkton montratan de la greko, ekvidis Ligian.

## Ĉapitro 21<sup>a</sup>

La sango ekbolis en la juna patricio ĉe ŝia vido. Li forgesis pri la amaso, pri la maljunulo, pri sia miro pro la nekompreneblaj aferoj, kiujn li aŭdis, kaj vidis antaŭ si nur ŝin solan. Jen fine post la tuta penado, post la longaj tagoj da maltrankvilo, baraktado, ĉagrenoj — li ŝin retrovis! Unuafoje en la vivo li spertis, ke ĝojo povas ataki la bruston, kiel sovaĝa besto, kaj premi ĝin ĝis perdo de la spiro. Li, kiu ĝis nun kredis, ke Fortuno havas kvazaŭ la devon plenumadi ĉiujn liajn dezirojn, nun apenaŭ kredis al siaj okuloj kaj al sia feliĉo. Se tiu nekredo lin ne detenus, lia ekscitiĝema naturo povus puŝi lin al iu malprudenta paŝo; sed li volis antaŭe konvinkiĝi, ĉu tio ne estas daŭrigo de tiuj mirakloj, kiuj plenigis lian kapon, kaj ĉu li ne songas. Sed tio estis senduba: li vidis Ligian kaj apartigis lin de ŝi distanco de apenaŭ dekkelkaj paŝoj. Ŝi staris en plena lumo, do li povis ĝui ŝian vidon, kiom li volis. La kapuĉo deŝoviĝis de ŝia kapo kaj malordigis la harojn; ŝia buŝo estis iom malfermita, la okuloj levitaj al la apostolo, la vizaĝo aŭskultofiksita kaj ravita. En mantelo el malhela lano, ŝi estis vestita, kiel knabino el la popolo; tamen Vinicio

neniam vidis ŝin pli belega, kaj malgraŭ la tuta pensokonfuzo en li estiĝinta, frapis lin kontraste al tiu preskaŭ sklava vesto la nobleco de ŝia mirinda, patricia vizaĝo. Amo trakuris lin, kiel fajro, amo grandega, miksitita kun stranga sento de sopiro, adoro, kulto kaj pasio. Li sentis volupton, kiun kaŭzis al li la nura vido de ŝi, kaj ĝuis ĝin, kiel refreŝigan akvon post longa soifado. Starante apud la grandega ligio, ŝi ŝajnis al li pli malgranda ol ŝi estis antaŭe, preskaŭ infano; li rimarkis ankaŭ, ke ŝi maldikiĝis. Ŝia vizaĝo estis preskaŭ travidebla; ŝi impresis lin kiel floro kaj animo. Sed tiom pli li deziris ekposedi tiun estaĵon, tiel diferencon de ĉiuj virinoj, kiujn li vidis aŭ posedis en Oriento kaj en Romo. Li sentis, ke li fordonus por ŝi ilin ĉiujn, kaj aldone al ili Romon kaj la mondon.

Li rigardus ŝin plue, ĝis senkonsciĝo, se Ĥilono ne ektirus lin je la rando de la mantelo, timante, ke Vinicio faros ion, kio povus ilin endanĝerigi. La kristanoj dume komencis preĝi kaj kanti. Post momento ektondris «*Maranata!*»<sup>223</sup>, kaj poste la granda apostolo komencis bapti per la fontana akvo tiujn, kiujn presbiteroj prezentis, kiel preparitajn por akcepti la bapton. Al Vinicio ŝajnis, ke tiu

<sup>223</sup> Ambigua kunfanda transskribo (Μαράθα) de 2 arameaj vortoj — ĝi povas signifi «Venu, Sinjoro!» (= Marana ta, מרנא תא), aŭ eble «Nia Sinjoro venis!» (= Maran ata, מרן את). La Londona Biblio donas la duan interpreton (Maran ata) en 1Kor 16:22.

nokto neniam finiĝos. Li volis nun plej baldaŭ sekvi Ligan kaj kapti ŝin envoje aŭ el ŝia loĝejo.

Fine kelkiuj komencis forlasi la tombejon. Ĥilono tiam flustris:

— Ni eliru, sinjoro, antaŭ la pordegon, ĉar ni ne depresnis la kapuĉojn kaj oni nin rigardas.

Tiel estis efektive. Kiam dum la parolado de la apostolo ĉiuj forĵetis la kapuĉojn por pli bone aŭdi, ili ne sekvis la ĝeneralan ekzemplon. La konsilo de Ĥilono prezentiĝis al li kiel prudenta. Starante ĉe la pordego, ili povis atenti ĉiujn elirantojn, kaj Urson ne estis malfacile rekoni laŭ liaj figuro kaj kresko.

— Ni sekvu ilin, — diris Ĥilono, — kaj vidu, en kiun domon ili eniros, kaj morgaŭ, aŭ pli ĝuste, jam hodiaŭ, ĉi ĉirkaŭigos, sinjoro, ĉiujn enirejojn de la domo per sklavoj kaj forprenos ŝin.

— Ne! — diris Vinicio.

— Kion ci volas fari, sinjoro?

— Ni eniros post ŝi la domon kaj forkaptos ŝin senprokraste: ci ja konsentis tion, Krotono?

— Jes, — diris la gladiatormajstro, — kaj mi donas min mem kiel sklavon al ci, sinjoro, se mi ne rompos la sakron al tiu bubalo, kiu ŝin gardas.

Sed Ĥilono komencis malkonsili kaj petegi ilin je ĉiuj

dioj, ke ili tion ne faru. Krotono ja devis esti prenita nur por defendo, por la okazo, se oni ilin rekonus, ne por forkapti la fraŭlinon. Prenante ŝin nur duope, ili riskos morton kaj, plie, povas ellasi ŝin el la manoj, post kio ŝi kaŝos sin en alian lokon aŭ forlasos Romon. Kaj kion ili faros? Kial ne agi sekure, kial elmeti sin mem al pereco kaj la tutan entreprenon al malcerteco de la sukceso?

Vinicio, kvankam li detenis sin kun plej granda fortoŝtreĉo, por tuj en la tombejo ne kapti Ligian en la brakojn, sentis tamen, ke la greko pravas, kaj li sekvus liajn konsilojn, se ne enmiksus sin Krotono, kiu timis pri sia rekompenco.

— Sinjoro, ordonu silenti al ĉi tiu maljuna sentaŭgulo, — li diris, — aŭ permesu al mi mallevi la pugnon sur lian kapon. Foje en Buksento<sup>224</sup>, kien min venigis al cirkuloj Lucio Saturneno, atakis min en gastejo sep ebriaj gladiatoroj, kaj neniu restis sen rompitaĵoj. Mi ne diras, ke ni forkaptu la fraŭlinon nun, ĉar ili povus ĵeti ŝtonojn sub niajn piedojn, sed kiam ŝi foje estos hejme, mi forkaptos ŝin kaj portos, kien ci volas.

Vinicio ekĝojis, aŭdante tiujn vortojn, kaj diris:

— Tiel okazu, je Herkulo! Morgaŭ ni povus hazarde ne trovi ŝin hejme, kaj se ni alarmus ilin, ili forkondukus

<sup>224</sup> Lat. *Buxentum* — marborda urbo en sudokcidenta Italio (nun la itala urbeto *Policastro Bussentino*).

ŝin sendube.

— Tiu ligio ŝajnas al mi terure forta! — ekĝemis Ĥilono.

— Ne al ci oni ordonas teni liajn manojn, — respondis Krotono.

Ili devis tamen longe ankoraŭ atendi, kaj kokoj komencis krii tagiĝon, antaŭ ol ili ekvidis Urson eliri el la pordego, kaj kun li Ligian. Akompanis ilin kelkaj aliaj personoj. Al Ĥilono ŝajnis, ke li rekonas inter ili la grandan apostolon; apud li paŝis alia maljunulo, multe malpli altkreska, du nejunaj virinoj kaj knabo, kiu prilumis la vojon per lanterno. Post ĉi tiu areto iris amaso, nombranta proksimume ducent personojn. Vinicio, Ĥilono kaj Krotono miksiĝis kun la amaso.

— Jes, sinjoro, — diris Ĥilono, — cia fraŭlino trovas sin sub potenco gardo. Jen li estas kun ŝi, la granda apostolo! Ĉar vidu, kiel la homoj surgenuiĝas antaŭ li en la fronto.

La homoj efektive surgenuiĝadis, sed Vinicio ne rigardis ilin. Ne perdante eĉ por momento Ligian el la vido, li pensis nur pri ŝia forkapto kaj, kutimiĝinte en militoj al ĉiaspecaj ruzoj, li preparis en la kapo la tutan planon de la forkapto. Li sentis, ke la paŝo, kiun li entreprenis, estis riska, sed li bone sciis, ke riskaj paŝoj ordinare sukcese finiĝas.

La vojo estis tamen longa, do en momentoj li pensis ankaŭ pri la abismoj, kiujn inter li kaj Ligia elfosis tiu stranga instruo, kiun ŝi konfesis. Li komprenis nun ĉion, kio okazis en la pasinteco, kaj komprenis, kial tio okazis. Li estis por tio sufiĉe penetrema. Jen li ĝis nun ne konis Ligian. Li vidis en ŝi la plej belan el ĉiuj knabinoj, al kiu ekflamis lia pasio, kaj nun li ekkomprenis, ke tiu instruo faris el ŝi estaĵon diferencon de aliaj virinoj, kaj ke la espero, ke ankaŭ ŝin allogos pasio, avido je riĉaĵoj, volupto, estas vana iluzio. Li ekkomprenis fine tion, kion li kune kun Petronio ne komprenis, ke tiu nova religio inokuladis en la animojn ion nekonatan al ĉi tiu mondo, en kiu li vivis, kaj ke Ligia, eĉ se ŝi lin amus, oferos pro li nenion el siaj kristanaj veroj; ke se ekzistas por ŝi volupto, ĝi estas tute alia ol tiu, kiun aspiris li kaj Petronio, kaj la imperiestra kortego kaj la tuta Romo. Ĉiu alia virino, kiun li konis, povus iĝi lia amatino, tiu ĉi kristanino povus esti nur viktimo.

Kaj pensante pri tio, li spertis brulan doloron kaj kole-ron, kaj sentis kune, ke tiu kolero estas senpova. Forkapti Ligian ŝajnis al li afero ebla kaj pri tio li estis preskaŭ certa, sed li estis same certa, ke kontraŭ tiu instruo li mem, lia braveco, lia potenco estas nenio kaj ke li estas senhel- pa kontraŭ ĝi. Li, romia armea tribunuso, konvinkita, ke

tiu forto de glavo kaj pugno, kiu ekregis la mondon, regos ĝin eterne, unuafoje en la vivo ekvidis, ke ekster ĝi povas ekzisti ankoraŭ io alia, do kun mirego li demandis sin mem: kio tio estas? Kaj li ne sciis klare respondi al si, lian kapon nur trakuradis bildoj de la tombejo, de la kunveninta amaso kaj de Ligia, tutanime aŭskultofiksita de la vortoj de la maljunulo, rakontanta pri la sufero, morto kaj leviĝo el mortintoj de Dio-homo, kiu elaĉetis la mondon kaj promesis al ĝi feliĉon trans Stikso.

Kaj kiam li pensis pri tio, en lia kapo estiĝadis ĥaoso.

Sed el tiu ĥaoso eligis lin plendado de Ĥilono, kiu komencis vei sian sorton: li ja estis dungita por trovi Ligian, kiun li, malgraŭ vivdanĝero, trovis kaj montris. Sed kion pli oni volas de li? Ĉu li interkonsentis ŝin forkapti, kaj kiu povus eĉ postuli ion similan de kriplulo, senigita je du fingroj, de homo maljuna, absorbita de meditado, scienco kaj virto? Kio okazos, se sinjoro tiel nobla, kiel Vinicio, suferos ian kontuzon, forkaptante la fraŭlinon? Sendube, la dioj devus ŝirmi siajn elektitojn, sed ĉu ne okazas iafoje tiaj aferoj, kvazaŭ la dioj ludus damojn, anstataŭ rigardi, kio fariĝas en la mondo? Fortuno, kiel oni scias, havas bandaĝon sur la okuloj, sekve ŝi ne vidas eĉ tage, kion do oni esperu de ŝi nokte? Okazu nur akcidento, tiu ligia urso ĵetu sur Vinicion muelŝtonon, barelon kun vino, aŭ, pli



malbone, kun akvo, kaj kiu garantias, ĉu la mizeran Ĥilono, anstataŭ rekompenco, ne trafos respondeco? Li, mizera saĝulo, ekamis ankaŭ la noblan Vinicion, kiel Aristotelo Aleksandron Macedonan, kaj se almenaŭ la nobla Vinicio donus al li la monsakon, kiun antaŭ liaj okuloj li fiksis post la zono, elirante el la domo, li havus eblon, en okazo de malfeliĉo, tuj alvoki helpon aŭ pacigi la kristanojn mem. Ho! Kial ili ne volas aŭskulti la konsilojn de maljunulo, diktatajn de prudento kaj sperto?

Vinicio, aŭdinte tion, eligis la monsakon el post la zono kaj ĝin ĵetis al Ĥilono:

— Prenu kaj silentu.

La greko eksentis, ke ĝi estis neordinare peza, kaj lia kuraĝo kreskis.

— Mia tuta espero estas en tio, — li diris, — ke Herkulo kaj Tezeo plenumadis agojn eĉ pli malfacilajn, kaj kio estas mia persona, plej intima amiko Krotono, se ne Herkulo? Cin, nobla sinjoro, mi ne nomas duondio, ĉar ci estas kompleta dio kaj ne forgesos ankaŭ plue pri cia servisto, malriĉa sed fidela, kies bezonojn oni devas prizorgi de tempo al tempo, ĉar li mem, se li foje profundiĝas en librojn, tute pri nenio zorgas ... Negranda ĝardeno kaj dometo kun eĉ plej eta portiko, donanta ombron somere, estus io inda je tia donacanto. Dume mi admiros de mal-

proksime viajn heroajn agojn, alvokos Jovon, ke li vin favoru, kaj en okazo de bezono mi faros tian bruon, ke duono da Romo vekiĝos kaj alkuros vin helpi. Kia malbona kaj malebena vojo! La olivoleo en mia lanterno elbrulis, kaj se Krotono, kiu estas same nobla, kiel forta, volus preni min sur la brakojn kaj porti ĝis la pordego, unue mi ekkonus, ĉu li facile forportos la fraŭlinon, due, li agus, kiel Eneo, kaj fine li favorigus al si ĉiujn pli honestajn diojn en tia grado, ke pri la rezulto de la entrepreno mi estus tute trankvila.

— Mi preferus porti kadavron de ŝafo, mortinta je pustuloj antaŭ monato, — respondis la gladiatormajstro, — sed se ci donos al mi tiun ĉi monsakon, kiun ĵetis al ci la nobla tribunuso, mi portos cin ĝis la pordego.

— Ci elartikigu cian piedan dikfingron! — respondis la greko. — Tiom do ci profitis el la instruoj de tiu respektinda maljunulo, kiu prezentis malriĉecon kaj kompatemon kiel la du plej ĉefajn virtojn? Ĉu li ne ordonis klare al ci ami min? Mi vidas, ke neniam mi faros el ci eĉ malplej bonan kristanon, ĉar pli facile estus al la suno penetri tra la murojn de la Mamertina malliberejo<sup>225</sup> ol al la vero tra cian hipopotaman kranion.

Kaj Krotono, kiu posedis bestan forton, sed aliflanke

<sup>225</sup> Mezepoka nomo de la plej malnova malliberejo de Romo (propre, *Carcer Tullianum*).

posedis neniajn homajn sentojn, diris;

— Ne timu! Mi ne iĝos kristano! Mi ne volas perdi mian panpecon!

— Jes, sed se ci havus eĉ nur elementajn sciojn pri la filozofio, ci sciус, ke oro estas vantaĵo.

— Alpaŝu min kun la filozofio, tiam mi donos al ci nur unu kapobaton sur la ventron, kaj ni vidos, kiu venkos.

— La samon povus diri bovo al Aristotelo, — respondis Ĥilono.

Tagiĝo grizigis la mondon. Brilo pale kolorigis la sunprojn de muroj. Apudvojaj arboj, konstruaĵoj kaj tie kaj ie disĵetitaj tomoŝtonoj komencis elprofundiĝi el la krepusko. La vojo ne plu estis tute senhoma. Legomvendistoj rapidis al la baldaŭ malfermotaj pordegoj, kondukante azenojn kaj mulojn, ŝarĝitajn per legomoj; ialoke knaris veturiloj, sur kiuj oni portis ĉasaĵojn. Sur la vojo kaj ambaŭflanke de ĝi kuŝis maldensa nebulo, anoncanta belveteron. Homoj, vidate de iom granda distanco, aspektis en tiu nebulo kiel spiritoj. Vinicio fikse rigardis la gracian figuron de Ligia, kiu, laŭgrade kiel la matenlumo kreskis, iĝadis ĉiam pli arĝenta.

— Sinjoro, — diris Ĥilono, — mi ofendus cin, se mi antaŭvidus, ke cia malavareco iam elĉerpiĝos, sed nun, kiam ci pagis al mi, ci ne povas suspekti, ke mi parolas nur por

mia profito. Mi do konsilas al ci ankoraŭfoje, ke ci, eksciente, en kiu domo loĝas la dia Ligia, revenu hejmen por preni ciajn sklavojn kaj portilon kaj ne aŭskultu tiun ĉi elefantan rostron Krotonon, kiu nur tial entreprenas forkapti sola la fraŭlinon por monelpremi cian monujon, kiel sakon da kazeo.

— Mi promesas al ci pugnobaton inter la skapolojn, tio signifas, ke ci pereos, — diris Krotono.

— Mi promesas al ci kruĉon da Kefalonia<sup>226</sup> vino, tio signifas, ke mi estos sana, — respondis la greko.

Vinicio nenion respondis, ĉar ili proksimiĝis al la pordego, ĉe kiu stranga bildo frapis iliajn okulojn. Nome du soldatoj surgenuiĝis, kiam la apostolo estis pasanta, kaj li tenis dum momento la manojn sur iliaj feraj kaskoj, poste faris super ili la signon de kruco. Al la juna patricio neniam venis ĝis nun la ideo, ke jam eĉ inter la soldatoj povas esti kristanoj, kaj kun mirego li pensis, ke kiel en brulanta urbo flamoj kaptas ĉiam novajn domojn, tiel tiu instruotagon post tago kaptas evidente novajn animojn kaj distastiĝas nekredeble rapide. Tio lin frapis ankaŭ pro Ligia, ĉar li konvinkiĝis, ke se ŝi volus forkuri el la urbo, troviĝus gardistoj, kiuj mem sekrete faciligus al ŝi la eliron. Li dankis ĉiujn diojn, ke tiel ne okazis.

<sup>226</sup> La plej granda el la Ioniaj insuloj okcidenten de la kontinenta Greklando; novgreke Κεφαλλονιά (PIV-e Gefalonio).

Pasinte la malplenajn lokojn ekstermuregajn, la kristanaj aretoj komencis disiĝadi. Nun necesis sekvi Ligian de pli malproksime kaj pli singarde por ne turni al si atenton. Ĥilono komencis plendi pri vundoj kaj ŝirdoloro en la piedoj kaj restis ĉiam pli malantaŭe, kion Vinicio ne kontraŭstaris, opiniante, ke nun la timeman kaj malfortan grekon li ne plu bezonos. Li eĉ permesus al li foriĝi, kien li volus; tamen kvankam la noblan saĝulon detenis prudento, sed puŝis lin evidente scivolo, ĉar li sekvis ilin senĉese kaj iafoje eĉ proksimiĝadis, ripetante siajn antaŭajn konsilojn kaj esprimante supozon, ke la maljunulo, akompananta la apostolon, se lia kresko ne estus tro malalta, povus esti Glaŭko.

Ili tamen iris ankoraŭ sufiĉe longe ĝis Transtibero, kaj la suno jam preskaŭ supreniris, kiam la areto, en kiu estis Ligia, disiĝis. La apostolo, la maljuna virino kaj la knabo sin direktis laŭlonge de la rivero, dum la malpli alta maljunulo, Urso kaj Ligia sin turnis en mallarĝan strateton kaj, irinte ankoraŭ ĉirkaŭ cent paŝojn, eniris la vestiblon de domo, en kiu estis du vendejoj, unu kun olivoleo, la alia de birdisto.

Ĥilono, kiu iris eble kvindek paŝojn post Vinicio kaj Krotono, tuj haltis, kvazaŭ fiksite en la teron, kaj, sin preminte al la muro, komencis sible voki, ke ili revenu al li.

Kaj ili faris tion, ĉar necesis interkonsiliĝi.

— Iru, — Vinicio diris al Ĥilono, — kaj vidu, ĉu ĉi tiu domo havas de malantaŭe elirejon al alia strato.

Ĥilono, kvankam antaŭ momento li plendis pri vundoj en la piedoj, ekkuris tiel vigle, kvazaŭ li havus ĉe la maleoloj la flugiletojn de Merkuro.

— Ne, — li diris, — ĉi tiu elirejo estas la sola.

Poste li kunmetis la manojn:

— Je Jovo, Apolono, Vesto, Cibelo, Izido kaj Oziriso, je Mitro, Baalo kaj ĉiuj dioj de Oriento kaj Okcidento, mi petegas cin, sinjoro, lasu tiun ĉi planon... Aŭskultu min...

Sed subite li haltis, ĉar li rimarkis, ke la vizaĝo de Vinicio paliĝis de emocio kaj liaj okuloj fajris, kiel pupiloj de lupoj. Sufiĉis lin rigardi por kompreni, ke nenio en la mondo lin detenos de la entrepreno. Krotono komencis plumblovi sian herkulanan bruston per spiro kaj balanci ambaŭflanken sian primitivan kranion, kiel faras ursoj en kaĝo. Cetere sur lia vizaĝo ne vidiĝis eĉ plej eta maltrankvilo.

— Mi eniros unua! — li diris.

— Ci sekvos min! — diris Vinicio per ordona voĉo. Kaj post momento ili ambaŭ malaperis en la malluma vestiblo.

Ĥilono ekkuris al la angulo de plej proksima strateto

kaj komencis, rigardante de post la angulmuro, atendi kio okazos.

## Ĉapitro 22<sup>a</sup>

Vinicio nur en la korto ekkomprenis la tutan malfacilecon de la entrepreno. La domo estis granda, kelketaĝa, unu el tiuj domoj, da kiaj oni konstruis milojn en la tuta Romo, por havigi al si profiton el luigado de loĝejoj, kaj ordinare oni konstruis ilin tiel rapide kaj tiel malzorge, ke ne estis preskaŭ jaro, en kiu kelkaj el ili ne falis sur la kapojn de la loĝantoj. Tio estis veraĵ abelujoj, tro altaj kaj tro mallarĝaj, plenaj je ĉeloj kaj kameretoj, en kiuj nestis loĝantaro malriĉa, kaj samtempe tre multnombra. En la urbo, en kiu multaj stratoj ne havis nomojn, tiuj domoj ne havis numerojn; la posedantoj komisiis kolektadon de la luopago al siaj sklavoj, tiuj tamen, ne devigate de la urba registaro prezenti la nomojn de la loĝantoj, ofte mem ilin ne konis. Informiĝi pri iu en tia domo estis treege malfacile, precipe se ĉe la pordego ne estis pordisto.

Tra longa vestiblo, simila al koridoro, Vinicio kaj Krotono eliris sur malvastan korton, kvarflanke baritan de konstruaĵoj, ion en la speco de atrio komuna por la tuta domo, kun fontano en la mezo, kies akvo ŝprucfalas en ŝtonan pladegon, enmasonitan en la teron. Ĉe ĉiuj muroj

levis sin internaj ŝtuparoj, parte ŝtonaj, parte lignaj, kondukantaj al galerioj, el kiuj oni eniris en loĝejojn. Ankaŭ malsupre estis loĝejoj, kelkaj provizitaj per lignaj pordoj, aliaj apartigitaj de la korto nur per lanaj, plejparte ĉifonigintaj, truhavaj aŭ flikitaj kurtenoj.

La horo estis frua kaj sur la korto ne videblis eĉ unu vivanto. Evidente en la tuta domo ĉiuj ankoraŭ dormis, krom la revenintoj el Ostriano.

— Kion ni faros, sinjoro? — demandis Krotono haltante.

— Ni atendu ĉi tie; eble iu aperos, — respondis Vinicio. — Oni ne vidu nin en la korto.

Sed samtempe li pensis, ke la konsilo de Ĥilono estis praktika. Se li havus kelkdek sklavojn, li povus sieĝi la pordegon, kiu ŝajnis esti la sola elirejo, kaj traserĉi ĉiujn loĝejojn; dume nun ili devis tuj trafi la loĝejon de Ligia, ĉar alie kristanoj, kiuj certe estis kelknombraj en tiu domo, povus ŝin averti, ke oni ŝin serĉas. Ankaŭ tial estis danĝere demandi fremdajn homojn.

Vinicio pripensis dum momento, ĉu li revenu por preni siajn sklavojn, kiam subite de post unu el la kurtenoj de la plej malproksmaj loĝejoj eliris homo kun kribrilo en la mano kaj alpaŝis la fontanon.

La juna viro tuj rekonis Urson.



- Tio estas la ligio! — flustris Vinicio.
- Ĉu mi tuj rompu liajn ostojn?
- Atendu.

Urso ne rimarkis ilin, ĉar ili staris en la ombro de la vestiblo; li komencis trankvile lavi en la akvo legomojn plenigantajn la kribrilon. Evidente, post la tuta nokto, pasigita en la tombejo, li intencis prepari matenmanĝon el ili. Post momento, fininte sian laboron, li prenis la malsekan kribrilon kaj malaperis kun ĝi post la kurteno. Krotono kaj Vinicio ekiris post li, certaj ke ili trafos rekte en la loĝejon de Ligia.

Granda do estis ilia miro, kiam ili ekvidis, ke la kurteno apartigis de la korto ne loĝejon, sed alian malluman koridoron, en kies fino oni vidis ĝardeneton, konsistantan el kelkaj cipresoj, kelkaj mirtaj arbustoj kaj malgrandan dometon, kroĉitan al senporda posta muro de alia konstruaĵo.

Ili ambaŭ tuj ekkomprenis, ke tio estis cirkonstanco favora por ili. En la korto povus okazi tumulto de ĉiuj loĝantoj, dum la flanko situo de la dometo igis la entreprenon pli facila. Rapide ili finos la aferon kun defendantoj, aŭ pli ĝuste kun Urso, post kio same rapide ili atingos kun la forkaptita Ligia la straton, kaj tie la resto estos facila. Probable neniu ilin haltigos, kaj se oni ilin haltigos, ili diros,

ke la afero koncernas forkurintan garantiulinon de la imperiestro; en plej malbona okazo Vinicio sin konigos al la *vigiloj* kaj alvokos ilian helpon.

Urso estis jam preskaŭ eniranta la dometon, kiam bruo de la paŝoj turnis lian atenton, li do haltis kaj, ekvidinte du homojn, metis la kribrilon sur balustradon kaj reiris al ili.

— Kion vi serĉas ĉi tie? — li demandis.

— Cin! — respondis Vinicio.

Poste, sin turninte al Krotono, li komandis per rapida, mallaŭta voĉo:

— Mortigu!

Krotono eksaltis, kiel tigro, kaj en unu momento, antaŭ ol la ligio povis ekkonscii aŭ rekoni la malamikojn, kaptis lin en siajn ŝtalajn brakojn.

Vinicio estis tro certa pri superhoma forto de Krotono por atendi la finon de la batalo — pasinte preter ili, li ekkuris al la pordo de la dometo, ĝin puŝis kaj troviĝis en duonluma ĉambro, iom heligata de fajro brulanta en kamento. La brilo de tiu flamo falis rekte sur la vizaĝon de Ligia. Alia persono, sidanta ĉe la fajro, estis la maljunulo, kiu akompanis la knabinon kaj Urson envoje de Ostriano.

Vinicio enkuris tiel subite, ke antaŭ ol Ligia povis lin rekoni, li kaptis ŝin je la talio kaj, levinte supren, resaltis

al la pordo. La maljunulo, vere, sukcesis bari ĝin per si mem, sed Vinicio, alpremite la knabinon per unu brako al la brusto, forpuŝis lin per la alia.

La kapuĉo falis de lia kapo kaj tiam, ĉe la vido de tiu vizaĝo, bone konata kaj ĉi-momente terura, la sango de Ligia glaciigis pro teruro kaj la voĉo mutiĝis en ŝia gorĝo. Ŝi volis voki helpon, sed ne povis. Same vane ŝi penis kapti la pordokadron por kontraŭstari. Ŝiaj fingroj deglitis de la ŝtono kaj ŝi perdis la konscion, se ne frapus ŝiajn okulojn terura bildo, kiam Vinicio elkuris kun ŝi en la ĝardenon.

Urso tenis en la brakoj iun homon, tute fleksitan malantaŭen, kun kapo klinita flanken kaj kun sangoplena buŝo. Ekvidinte ilin, li frapis ankoraŭfoje per la pugno tiun kapon kaj en unu sekundo eksaltis, kiel furioza besto, al Vinicio.

«Morto!» — ekpensis la juna patricio.

Kaj post tio li ekaŭdis, kvazaŭ en sonĝo, ekkrion de Ligia: «Ne mortigu!» — poste li eksentis, ke io, kvazaŭ tondrobato, malvolvis liajn brakojn, per kiuj li ŝin ĉirkaŭtenis, fine la tero turniĝis kune kun li kaj la lumo de la tago estingiĝis antaŭ liaj okuloj.

\* \* \*

Ĥilono tamen, kaŝite malantaŭ la stratangula domo,

atendis, kio okazos, ĉar la scivolo batalis en li kontraŭ la timo. Li pensis ankaŭ, ke se ili sukcesos forkapti Ligian, tiam bone estos por li esti apud Vinicio. Urbanon li ne timis plu, ĉar ankaŭ li certis, ke Krotono mortigos tiun. Aliflanke li kalkulis, ke en la okazo ke en la ĝis nun senhomaj stratoj komenciĝos tumulto, se kristanoj aŭ iuj ajn homoj volos kontraŭstari al Vinicio, tiam li alparolos ilin kiel reprezentanto de la regna aŭtoritato, kaj se necesos, alvokos la *vigilojn* helpe al la juna patricio kontraŭ la strata kanajlaro, kaj tiamaniere sekurigos al si novajn favorojn.

En la animo li plu opiniis, ke la ago de Vinicio estas malprudenta; konsiderante tamen la teruran forton de Krotono, li supozis, ke ĝi povos sukcesi.

«Se ilia situacio estos malbona, la tribunuso mem portos la knabinon, kaj Krotono tratabos por li la vojon».

Tamen la tempo ŝajnis al li longa; maltrankviligis lin silento en la vestiblo, kiun li rigardis de malproksime.

«Se ili ne trafos en ŝian kaŝejon kaj faros bruon, ili foralartos ŝin.»

Kaj cetere, la penso pri tio ne estis al li malagrabla, ĉar li komprenis, ke en tia okazo Vinicio denove lin bezonos kaj denove li sukcesos elpremi el lia sako konsiderindan nombron da sestercoj.

«Kion ajn ili faros», li diris al si mem, «tion ili faros por mi, kvankam neniu el ili divenas tion. Dioj, dioj, lasu min nur...»

Kaj subite li haltis, ĉar ŝajnis al li, ke io sin elŝovas el la vestiblo; do, sin preminte al la muro, li komencis rigardi, retenante la spiron en la brusto.

Kaj li ne eraris, ĉar el la vestiblo duone elŝoviĝis kapo kaj komencis rigardi ĉirkaŭen.

Post momento ĝi tamen malaperis.

«Tio estas Vinicio aŭ Krotono», ekpensis Ĥilono, «sed, se ili kaptis la knabinon, kial ŝi ne krias kaj kial ili rigardas en la straton? Homojn ili ja ĉiuokaze devas renkonti, ĉar antaŭ ol ili venos ĝis Karinoj, la stratoj iĝos movplenaj. — Kio estas tio!? Je ĉiuj senmortaj dioj!...»

Kaj subite ĉiuj restintaj haroj hirtiĝis sur lia kapo.

En la pordo montriĝis Urso kun la korpo de Krotono pendanta trans lia ŝultro kaj, rigardinte ĉirkaŭen ankoraufoje, li komencis kuri kun ĝi tra la malplena strato al la rivero.

Ĥilono sin faris tiel plata ĉe la muro, kiel peco da stukaĵo.

«Mi pereos, se li min ekvidos!» li ekpensis.

Sed Urso kuris rapide preter la stratangulo kaj malaperis post la sekvanta domo. Ĥilono, ne plu atendente,

komencis kuri laŭlonge de diagonala strateto, klakante per la dentoj pro teruro kaj kun rapido kiu mirigus eĉ en junulo.

«Se li, revenante, min ekvidos de malproksime, li min atingos kaj mortigos», li parolis al si. «Savu min, Zeŭso, savu Apolono, savu Hermeso, savu Dio de la kristanoj! Mi forlasos Romon, reiros en Mezembrion, sed savu min el la manoj de tiu demono!»

Kaj tiu ligio, kiu mortigis Krotonon, efektive ŝajnis al li ĉi tiam estaĵo superhoma. Kurante li pensis, ke tio eble estas iu dio surprininta la formon de barbaro. En tiu momento li kredis je ĉiuj dioj de la mondo, kiujn li mokis alitempe. Lian kapon trakuris ankaŭ la penso, ke Krotonon mortigis eble la dio de la kristanoj, kaj denove la haroj hirtiĝis sur lia kapo, ke li ekmalpaciĝis kun tia potenco.

Nur trakurinte kelkajn stratetojn kaj ekvidinte iujn laboristojn, irantaj renkonte de malproksime, li iom trankviliĝis. En lia brusto jam mankis spiro, do li sidiĝis sur sojlo de domo kaj per la rando de la mantelo komencis viŝi la ŝvitkovritan frunton.

«Mi estas maljuna kaj bezonas trankvilon», li diris.

La homoj, irantaj renkonten, sin turnis en iun flankan strateton kaj denove ĉirkaŭis lin soleco. La urbo ankoraŭ dormis. Matene la stratmovado komenciĝadis pli frue en

la pli riĉaj kvartaloj, kie sklavoj de riĉaj domoj estis devigataj leviĝi antaŭ la plentago; kaj en tiuj, kiujn okupis loĝantaro libera, nutrata je la regna kosto, sekve senfarema, oni vekiĝis, precipe vintre, sufiĉe malfrue.

Hilono, sidinte dum kelka tempo sur la sojlo, eksentis penetran malvarmon, li do leviĝis kaj, certiĝinte, ke li ne perdis la sakon ricevitan de Vinicio, sin direktis per paŝoj jam malpli rapidaj al la rivero.

«Eble mi vidos ie la korpon de Krotono», li parolis al si. «Dioj! Tiu ligio, se li estas homo, povus en la daŭro de unu jaro gajni milionojn da sestercoj, ĉar se Krotonon li sufokis, kiel hundidon, kiu rezistos al li? Por ĉiu ludo sur areno oni donus al li tiom da oro, kiom li mem pezas. Li gardas tiun knabinon pli bone ol Cerbero la inferon. Sed englutu do lin tiu infero. Mi ne volas havi aferon kun li. Li estas tro malmolosta. Kion mi tamen faru? Okazis terura afero. Se al tia Krotono li rompis la ostojn, certe ankaŭ la animo de Vinicio plorplendas super tiu malbenita domo, atendante enterigon. Je Kastoro! Tio ja estis patricio, amiko de la imperiestro, sinjoro konata en la tuta Romo kaj arma tribunuso. Lia morto ne estos al ili lasita senpune ... Kaj se mi, ekzemple, irus en la tendaron de la pretorianoj, aŭ al la *vigiloj?*...»

Ĉe tio ĉi li eksilentis kaj komencis mediti, sed post

momento diris:

«Ve al mi! Kiu enkondukis lin en tiun domon, ĉu ne mi? Liaj liberigitoj kaj sklavoj scias, ke mi venadis al li, kelkaj eĉ scias por kiu celo. Kio estos, se oni min kulpigos, ke mi intence montris al li la domon, en kiu lin trafis morto? Eĉ se poste montriĝus en juĝejo, ke mi tion ne volis, oni diros ĉiuokaze, ke mi estas la kaŭzo de tio ... Kaj li ja estis patricio, do neniel mi restos senpuna. Sed se mi kaŝe forlasos Romon kaj translokiĝos ien malproksimen, mi nur pligrandigos la suspekton.»

Kaj tiel, kaj alie estis malbone. Li nur penis elekti la malpli grandan malbonon. Romo estis grandega urbo, tamen Ĥilono eksentis, ke ĝi povas esti tro malvasta por li. Ĉar ĉiu alia povus simple iri al la prefekto de la *vigiloj*, rakonti, kio okazis, kaj eĉ se falus sur lin ia suspekto, trankvile atendi la esploradon. Sed la tuta pasinteco de Ĥilono estis tiaspeca, ke ĉia pli proksima konatiĝo, ĉu al la prefekto de la urbo, aŭ al la prefekto de la *vigiloj*, povus kaŭzi al li tre gravajn embarasojn kaj kune doni bazon al ĉiaj suspektoj, kiuj povus veni en la kapojn de la oficistoj.

Aliflanke, forkuro pensigus Petronion ke Vinicio estis perfidita kaj murdita sekve de komploto. Petronio estis homo potenca, kiu povis havi al sia dispono la policon en la tuta regno kaj kiu sendube klopodus elserĉi la kulpul-



ojn, eĉ en la ekstremoj de la mondo. Tamen al Ĥilono venis la ideo, ĉu plej bone estus sin turni al li kaj rakonti, kio okazis. Jes! Tio estis la plej bona maniero. Petronio estis homo trankvila kaj Ĥilono povis esti certa almenaŭ pri tio, ke li aŭskultos ĝis la fino. Konante la aferon ekde la komenco, Petronio pli facile ol la prefektoj ekkredus je la senkulpeco de Ĥilono.

Tamen por iri al Petronio necesis scii certe, kio okazis pri Vinicio, kaj Ĥilono tion ne sciis. Li vere vidis la ligion ŝteliri al la rivero kun la korpo de Krotono, sed nenion pli. Vinicio povis esti mortigita — aŭ li povis esti vundita aŭ kaptita. Nur nun venis al Ĥilono la ideo, ke la kristanoj certe ne kuraĝus mortiĝi homon tiel potencan, aŭgustanon kaj altan armean oficiston, ĉar tia ago povus sekvigi kontraŭ ili ĝeneralan persekuton. Pli verŝajne estis, ke ili retenis lin perforte, por doni al Ligia tempon refoje sin kaŝi en alia loko.

Tiu penso rekuraĝigis Ĥilonon.

«Se tiu ligia drako ne disŝiris lin en la unua impeto, li estas viva, kaj se li estas viva, li mem atestos, ke mi lin ne perfidis, kaj tiam ne nur nenio min minacos, sed (ho Hermeso, denove kalkulu je la du bovidinoj!) antaŭ mi malfermiĝos nova kampo ... Mi povas sciigi al unu el liaj liberigitoj, kie li serĉu la sinjoron; kaj ĉu li iros al la prefekto

aŭ ne, tio estas lia afero, gravas ke mi ne iru tien ... Kaj mi povas iri al Petronio kaj kalkuli je rekompenco ... Mi serĉis Ligian, nun mi serĉos Vinicion, kaj poste denove Ligian ... Tamen antaŭe necesas ekscii — ĉu li vivas, ĉu pereis.»

Ĉe tio li ekpensis, ke li povus nokte iri al la bakisto Demaso kaj demandi pri Urso. Sed li tuj forlasis tiun ideon. Li preferis ne havi aferon kun Urso. Li povis prave supozi, ke ĉar Urso ne mortigis Glaŭkon, lin probable avertis iu el la kristanaj ĉefuloj al kiu li malkaŝis sian intencion, — avertis, ke tio estas afero nepura kaj ke al ĝi lin instigis iu perfidulo. Cetere, ĉe la sola rememoro pri Urso Ĥilonon trakuris tutkorpa tremo. Li decidis, anstataŭe, ke vespere li sendos Eŭrikion en la domon, kie okazis la akcidento, por ricevi informojn. Dume li bezonis iom manĝi, sin bani kaj ripozi. La sendorma nokto, la vojo al Ostriano kaj la forkuro el Transtibero ekstermezure lin lacigis.

Unu afero konstante lin konsolis: nome tio, ke li havis ĉe si du sakojn — tiun, kiun Vinicio donis al li hejme, kaj tiun ĵetitan al li dum la reveno de la tombejo. Pro tiu feliĉa cirkonstanco, kaj pro la grandaj emocioj de li travivitaj, li decidis matenmanĝi pli abunde kaj trinki iom da vino pli bona ol ordinare.

Kaj kiam venis la horo de malfermo de vinejoj, li plenumis tion je tia grado, ke li forgesis pri bano. Antaŭ ĉio li

sentis dormemon, la dormemo lin senfortigis, kaj per tute ŝanceliĝemaj paŝoj li revenis en sian loĝejon en Suburo, kie lin atendis sklavino, aĉetita por la mono de Vinicio.

Tie, enirinte en sian dormoĉambron, malluman, kiel vulpa kavo, li ĵetis sin sur la liton kaj endormiĝis en unu momento.

Li vekigis nur vespere, aŭ pli ĝuste lin vekis la sklavinino, dirante ke iu serĉas lin kaj volas lin vidi en urĝa afero.

La akrasenta Ĥilono tuj rekonsciiĝis, haste surtiris mantelon kun kapuĉo kaj, ordoninte al la sklavino flankeniĝi, li antaŭ ĉio singarde rigardis tra la pordo.

Kaj li rigidiĝis! Ĉar tra la pordo de la dormoĉambro li ekvidis la grandegan figuron de Urso.

Ĉe tiu ĉi vido li eksentis, ke liaj piedoj kaj kapo iĝas malvarmaj, kiel glacio, la koro ĉesas bati, la sakron kvaŝaŭ tiklas aroj da formikoj ... Dum kelka tempo li ne povis paroli; poste tamen, klakante per la dentoj, li diris, aŭ pli ĝuste elĝemis:

— Sira! Mi forestas ... mi ne konas ... ĉi tiun bonan homon...

— Mi diris al li, ke ci estas hejme kaj ke ci dormas, sinjoro — respondis la sklavino — sed li postulis, ke mi cin veku...

— Ho dioj!... mi ordonos cin...

Sed Urso, kvazaŭ senpacienciĝinte pro la prokrasto, proksimiĝis al la pordo de la dormoĉambro kaj, sin klininte, enŝovis internen la kapon.

— Ĥilono Ĥilonido! — li diris.

— Paco al ci! Paco, paco! — respondis Ĥilono. — Ho, plej bona el la kristanoj! Jes, mi estas Ĥilono, sed tio estas eraro... Mi cin ne konas!

— Ĥilono Ĥilonido, — respondis Urso, — cia sinjoro, Vinicio, cin vokas, ke ci venu al li kune kun mi.

# Parto dua

## Ĉapitro 23<sup>a</sup>

Vinicio vekigis pro akra doloro. En la unua momento li ne povis kompreni, kie li estas kaj kio al li okazas. En la kapo li sentis bruon kaj liaj okuloj estis kvazaŭ kovritaj de nebulo. Iom post iom li akiris tamen la konscion kaj fine ekvidis tra tiu nebulo tri homojn klinitajn super li. Du el ili li rekonis: unu estis Urso, la alia — la maljunulo, kiun li faligis, forportante Ligian. La tria, fremda, tenis lian maldekstran brakon kaj, tuŝante ĝin laŭlonge de la kubuto ĝis la ŝultro kaj ŝlosilosto, estis ĝuste kaŭzanta al li doloron tiel teruran, ke Vinicio, supozante ke tio estas ia speco de venĝo plenumata kontraŭ li, diris tra la kunpremitaj dentoj:

— Mortigu min.

Sed ili ŝajne ne atentis liajn vortojn, kvazaŭ ili ne aŭdus aŭ konsiderus ilin ordinara ĝemo de suferanto. Urso, kun sia zorgoplena kaj kune timiga vizaĝo de barbaro tenis en la mano tufon da blankaj tolpecoj, ŝiritaj en longajn striojn, kaj la maljunulo parolis al la homo, kiu premis la brakon de Vinicio:

— Glaŭko, ĉu ci certas ke ĉi tiu vundo en la kapo ne

minacas la vivon?

— Jes, nobla Krispo<sup>227</sup>, — respondis Glaŭko. — Servante kiel sklavo en ŝiparo, kaj poste loĝante en Neapolo, mi kuracis multajn vundojn, kaj per la gajnoj, kiujn donis al mi tiu okupo, mi elaĉetis fine min mem kaj mian familion ... La vundo en la kapo estas negrava. Kiam ĉi tiu homo (li almontris Urson per la kapo) rekaptis de la junulo la knabinon kaj puŝis lin sur la muron, tiu supozeble sin ŝirmis per la brako, kaj falante, ĝin elartikigis kaj rompis, sed per tio savis la kapon — kaj la vivon.

— Ci jam flegis plurajn el la fratoj, — respondis Krispo, — kaj ci famas kiel lerta kuracisto ... Jen kial mi venigis cin pere de Urso.

— Kiu envoje konfesis al mi, ke ankoraŭ hieraŭ li estis preta min mortigi.

— Sed antaŭ ol al ci, li konfesis sian intencon al mi — kaj mi, konante cian amon al Kristo, klarigis al li, ke ne ci estas perfidulo, sed tiu nekonato, kiu volis instigi lin al la mortigo.

— Tiu estis malbona spirito, sed mi kredis lin anĝelo, — respondis Urso kun ĝemo.

— Ci rakontos al mi tion alifoje, — diris Glaŭko, — sed nun ni devas pensi pri la vundito.

<sup>227</sup> *Crispus* — Latina nomo, interalie de unu el la apostoloj el la sepdekopo (*Agoj*, 18:8), en la Londona Biblio esperantigita per *Krispo*.

Kaj dirinte tion, li komencis reenartikigi la brakon de Vinicio, kiu, malgraŭ tio, ke Krispo surŝprucadis lian vizaĝon per akvo, senĉese svenadis pro doloro. Tio estis por li cetere feliĉa cirkonstanco, ĉar li ne sentis la reenartikigon de la piedo nek bandaĝadon de la rompita brako, kiun Glaŭko enigis en du konkavajn tabuletojn kaj poste ĉirkaŭligis rapide kaj forte por ĝin senmovigi.

Sed post la fino de la operacio li denove konsciiĝis — kaj ekvidis super si Ligian.

Ŝi staris tuj apud lia lito, tenante antaŭ si malgrandan kupran sitelon kun akvo, en kiu Glaŭko de tempo al tempo trempis spongon por malseketigi lian kapon.

Vinicio rigardis kaj ne kredis al siaj okuloj. Ŝajnis al li, ke sonĝo aŭ febroy aperigas antaŭ li la karan vizion kaj nur post longa momento li kapablis elflstri:

— Ligia ...

Je lia voĉo la siteleto ekstremis en ŝiaj manoj, sed ŝi turnis al li siajn okulojn, plenajn je malĝojo.

— Paco estu kun ci, — ŝi respondis mallaŭte.

Ŝi staris kun etenditaj manoj, kun vizaĝo plena je kompatato kaj bedaŭro.

Kaj li rigardis ŝin, kvazaŭ volante tiel plenigi per ŝi la pupilojn, ke ŝia bildo restu sub liaj palpebroj, kiam li fermos ilin. Li rigardis ŝian vizaĝon, pli palan kaj pli mal-

dikan ol antaŭe, la buklojn de ŝiaj malhelaj haroj, la malriĉan laboristan veston; li rigardis tiel obstine, ke sub la influo de liaj okuloj ŝia neĝblanka frunto komencis rozkoloriĝi — kaj unue li ekpensis, ke plu li ŝin amas; due, ke la kaŭzo de tiu ŝia paleco, de ŝia malriĉeco estas li mem, ke li ja elpelis ŝin el la domo, kie ŝi estis amata kaj ĉirkaŭata per bonstato kaj komforto — enpuŝis ŝin en ĉi tiun malriĉan ĉambreton kaj vestis per tiu mizera vesto el malhela lano.

Kaj ĉar li dezirus vesti ŝin per plej multekostaj orteks-aĵoj, per ĉiuj juveloj de la mondo, tial kaptis lin mirego, teruro, kompato — kaj bedaŭro tiel granda, ke li falus al ŝiaj piedoj, se li povus moviĝi.

— Ligia, — li diris, — ci ne permesis min mortigi.

Kaj ŝi respondis per dolĉa tono:

— Dio redonu al ci la sanon.

Por Vinicio, kiu sentis respondecon same por la malbonagoj, kiujn li faris al ŝi antaŭe, kiel por tiu, kiun li ĵus volis al ŝi fari, en la vortoj de Ligia estis vera balzamo. Li forgesis ĉi-momente, ke per ŝia buŝo povas paroli la kristana instruo, kaj sentis nur, ke parolas la amegata virino kaj ke en ŝia respondo estas persona koreco, boneco simple superhoma, kiu skuas ĝisfunde lian animon. Kiel antaŭe pro doloro, tiel nun li svenetis pro kortuŝo. Ekregis



lin ia senforteco kune grandega kaj dolĉa. Li havis tian impreson, kvazaŭ li estus falanta ien en abismon, sed trovis ĉe tio, ke al li estas bone kaj ke li estas feliĉa. Kaj li pensis en la sveneto, ke apud li staras diino.

Dume Glaŭko finis lavi la vundon en lia kapo kaj metis al ĝi sanigan ŝmirajon. Urso prenis la siteleton el la manoj de Ligia, kaj ŝi, preninte de la tablo pretigitan vazon kun akvo miksitaj kun vino, metis ĝin al la buŝo de la vundito. Vinicio eltrinkis avide, post kio li eksentis grandan malpliigon de la sufero. Kiam la bandaĝado estis finita, la doloro preskaŭ ĉesis. La vundoj kaj kontuzoj komencis rigidiĝi. Li rekonsciiĝis preskaŭ komplete.

— Donu al mi trinki pli, — li diris.

Ligia iris kun la malplena vazo en alian ĉambron, dume Krispo, post malmultaj vortoj, interŝanĝitaj kun Glaŭko, proksimiĝis al la lito kaj diris:

— Vinicio, Dio ne lasis cin plenumi malbonagon, sed konservis al ci la vivon, por ke ci rigardu en cian animon. Tiu, antaŭ kiu homo estas nur polvo, transdonis cin sendefenda en niajn manojn. Sed Kristo, je kiu ni kredas, ordonis al ni ami eĉ niajn malamikojn. Ni do prizorgis ciajn vundojn kaj, kiel diris Ligia, ni preĝos, ke Dio redonu al ci la sanon, sed flegi cin plu ni ne povas. Restu do en paco kaj pensu, ĉu indus al ci plue persekuti Ligian, kiun ci

senigis je la zorgantoj, hejmo — kaj nin, kiuj per bono repagis al ci la malbonon?

— Ĉu vi volas min forlasi? — demandis Vinicio.

— Ni volas forlasi ĉi tiun domon, kie nin povas atingi persekutado de la prefekto de la urbo. Cia kamarado estas mortigita, kaj ci, kiu estas eminenta inter la ciaj, kuŝas ĉi tie vundita. Ne ni estas kulpaj pri tio, sur nin tamen devus fali la venĝo de la leĝo...

— Ne timu persekutadon, — diris Vinicio, — mi vin ŝirmos.

Krispo ne volis al li respondi, ke ili konsideras ne nur la prefekton kaj la policon, sed ke, ne fidante ankaŭ al li, ili volas sekurigi Ligian kontraŭ lia plua atakado.

— Sinjoro, — li diris, — cia dekstra mano estas sana — jen tabuletoj kaj skribilo: skribu al ciaj servistoj, ke hodiaŭ vespere ili venu al ci kun portilo kaj reportu cin en cian hejmon, kie ci havos pli da komforto ol meze de nia malriĉeco. Ni loĝas ĉi tie ĉe malriĉa vidvino, kiu baldaŭ alvenos kun sia filo — kaj la knabo portos cian leteron, dum ni ĉiuj devas serĉi alian rifuĝejon.

Vinicio paliĝis, ĉar li komprenis, ke oni volas disigi lin de Ligia, kaj ke se li denove ŝin perdos, eble neniam en la vivo li ŝin revidos ... Li komprenis vere, ke inter li kaj ŝi okazis grandaj aferoj, sekve de kiuj, volante ŝin ekposedi,

li devas serĉi iajn novajn vojojn, pri kiuj pensi li ne havis ankoraŭ tempon. Li komprenis ankaŭ, ke kion ajn li dirus al tiuj ĉi homoj, se li eĉ ĵurus al ili, ke li redonos Ligian al Pomponia Grecina, ili rajtas ne kredi al li kaj ne kredos. Li ja povis fari tion jam antaŭe; li ja povis, anstataŭ persekuti Ligian, iri al Pomponia Grecina, ĵuri al ŝi, ke li rezignos la persekutadon, kaj en tiu okazo Pomponia mem elserĉus kaj reprenus hejmen la knabinon. — Ne! Li sentis, ke neniam tiaspecaj promesoj kapablos ilin reteni kaj ke neniam solena ĵuro estos akceptita, tiom pli ke, ne estante kristano, li povus ja ĵuri al ili nur je la senmortaj dioj, je kiuj li mem ne multe kredis, kaj kiujn ili konsideris malbonaj spiritoj.

Li tamen malespere sopiris pacigi kaj Ligian, kaj tiujn ŝiajn zorgantojn per ia ajn rimedo — sed por tio necesis tempo. Li bezonis ŝin rigardi, eĉ se nur dum kelkaj tagoj. Kiel al dronanto ĉia rompaĵo de tabulo aŭ remilo ŝajnas savrimedo, tiel ankaŭ al li ŝajnis, ke dum tiuj kelkaj tagoj li kapablos eble diri ion, kio lin proksimigos al ŝi, ke eble li ion elpensos, eble okazos io favora.

Do, kolektinte la pensojn, li diris:

— Aŭskultu min, kristanoj. Hieraŭ mi estis kune kun vi en Ostriano kaj aŭskultis vian instruon, sed eĉ se mi ĝin ne konus, viaj agoj konvinkus min, ke vi estas homoj

honestaj kaj bonaj. Diru al la vidvino, kiu loĝas en ĉi tiu domo, ke ŝi restu ĉi tie; ankaŭ vi restu kaj lasu min resti. Tiu ĉi homo (li turnis la rigardon al Glaŭko), kiu estas kuracisto, aŭ almenaŭ estas kompetenta pri kuracado de vundoj, diru, ĉu oni povas min hodiaŭ transporti. Mi estas malsana kaj havas rompitan brakon, kiu devas almenaŭ kelkajn tagojn resti senmova — kaj tial mi deklaras, ke mi moviĝos de ĉi tie nur se vi elportos min perforte.

Ĉi tie li haltis, ĉar spiro ekmankis en lia frakasita brusto, kaj Krispo diris:

— Neniu uzos perforton kontraŭ ci, sinjoro, ni nur forportos de ĉi tie niajn kapojn.

Je tio la juna viro, ne kutimiĝinta al kontraŭstaro, sulkgigis la brovojn kaj diris:

— Lasu min ekspiri.

Kaj post momento li ekparolis denove:

— Pri Krotono, kiun Urso sufokis, neniu demandos; li estis ironta hodiaŭ en Beneventon, kien invitis lin Vatinio, ĉiuj do pensos, ke li forveturis. Kiam mi eniris kun Krotono en tiun ĉi domon, neniu nin vidis, krom unu greko, kiu ĉeestis kun ni en Ostriano. Mi diros al vi, kie li loĝas, venigu lin al mi — kaj mi ordonos al li silenti, ĉar tiu homo estas mia pagato. Hejmen mi skribos leteron, ke mi iris en Beneventon. Se la greko jam estas sciiginta la pre-

fekton, mi deklaras al li, ke mi mem mortigis Krotonon kaj ke li, Krotono, rompis al mi la brakon. Tiel mi faros, je la ombroj de mia patro kaj patrino! — vi do povas resti ĉi tie sendanĝere, ĉar eĉ unu haro ne falos de viaj kapoj. Venigu al mi rapide la grekon, kiu nomas sin Hîlono Hîlonido!

— Do Glaŭko restos ĉe ci, sinjoro, — respondis Krispo, — kaj zorgos pri ci kune kun la vidvino.

Vinicio sulkigis la brovojn ankoraŭ pli.

— Atentu, maljuna homo, kion mi diros, — li ekparolis. — Mi ŝuldas al ci dankemon kaj ci ŝajnas bona kaj honesta homo, sed ci ne diras tion, kion ci havas en la fundo de la animo. Ci timas, ke mi vokos miajn sklavojn kaj ordonos al ili forpreni Ligian? Ĉu ne tiel estas?

— Tiel estas, — respondis Krispo kun certa severeco.

— Konsideru do, ke mi parolos kun Hîlono en via ĉeesto kaj ke en via ĉeesto mi skribos leteron hejmen, ke mi forveturis, kaj ke aliajn senditojn, krom vi, mi poste ne trovos... Konsideru mem ĉi tion kaj ne incitu min plu.

Ĉe tio li ekscitiĝis kaj lian vizaĝon tordis kolero, post kio li komencis paroli kun emocio:

— Ĉu ci pensis, ke mi malkonfesos, ke mi volas resti por ŝin vidi? Eĉ malsaĝulo divenus, se mi malkonfesus. Sed perforte mi ŝin plu ne atencos ... Kaj al ci mi diros ion

alian. Se ŝi ne restos ĉi tie, tiam per tiu ĉi sana mano mi deŝiros la bandaĝojn de la brako, akceptos nek manĝon, nek trinkon — kaj mia morto falu sur cin kaj sur ciajn fra-tojn. Kial ci min flegis, kial ci ne ordonis min mortigi?

Kaj li paliĝis pro kolero kaj senfortiĝo. Sed Ligia, kiu el la apuda ĉambro aŭdis la tutan interparolon kaj kiu estis certa, ke Vinicio plenumos ĉion, kion li minacas, ektimis liajn vortojn. Neniel ŝi volis lian morton. Vundita kaj sendefenda, li vekis en ŝi nur kompaton, ne teruron. De la tempo de sia forkuro, vivante inter homoj absorbitaj de senĉesa religia ekstazo, pensantaj nur pri oferoj, sindonaj faroj kaj kompatato sen limoj, ŝi mem ekstaziĝis per tiu nova inspiro ĝis tia grado, ke ĝi anstataŭis al ŝi la hejmon, familion, la perditan feliĉon, kaj samtempe faris ŝin unu el tiuj kristanaj virgulinoj, kiuj poste aliigis la malnovan animon de la mondo. Vinicio tro multe signifis en ŝia sorto kaj tro multe trudis sin al ŝi, ke ŝi povu lin forgesi. Ŝi pensis pri li dum tutaj tagoj kaj ofte petis Dion pri tia momento, en kiu, sekvante la inspiron de la instruo, ŝi povus pagi al li bonon por la malbono, persekuti per kompatato, rompi lin, konkeri lin por Kristo kaj savi. Kaj nun ĝuste ŝajnis al ŝi, ke tia momento venis; kaj ke ŝiaj preĝoj estas elaŭskultitaj. Ŝi do proksimiĝis al Krispo kun vizaĝo kvazaŭ inspirita kaj komencis paroli tiel, kvazaŭ iu alia voĉo

parolus per ŝia buŝo:

— Krispo, li restu ĉi tie inter ni kaj ni restu kun li, ĝis Kristo lin resanigos.

Kaj la maljuna presbitero, kiu kutimis en ĉio serĉi diajn inspirojn, vidante ŝian ekzaltitecon, tuj ekpensis, ke eble supera forto parolas per ŝi kaj, ektiminte en la koro, klinis sian kapon:

— Estu tiel, kiel ci diras, — li respondis.

Vinicion, kiu dum la tuta tempo ne forturnis de ŝi la rigardon, profunde impresis tiu senprokrasta oboe de Krispo.

Ekŝajnis al li, ke Ligia estas inter la kristanoj ia sibilo aŭ pastrino, kiun ĉirkaŭas respekto kaj oboe. Kaj malgraŭvole ankaŭ li subiĝis al tiu respekto. Al lia amo nun miksiĝis ia kvazaŭtimo, kontraŭ kiu la amo mem ekŝajnis io preskaŭ aroganta. Li ankoraŭ ne povis kutimiĝi al la penso, ke ilia rilato inversiĝis, ke nun ne ŝi dependas de lia volo, sed li de la ŝia; ke jen li kuŝas malsana, venkita, ke li ĉesis esti la ataka, konkera forto kaj ke li estas kvazaŭ sendefenda infano en ŝia zorgado. Por lia naturo, fieraj kaj komandema, simila rilato al ĉiu alia persono estus humiliga — ĉi-foje tamen ne nur li ne sentis humiligon, sed estis al ŝi dankaj, kiel al sia mastrino. Tio estis en li senekzemplaj sentoj, kiajn tagon antaŭe li ne povus imagi kaj

kiuj mirigus lin eĉ en ĉi tiu momento, se li kapablus klare konscii ilin. Sed li ne demandis nun, kial tiel estas, kvazaŭ tio estus tute natura afero; li nur estis feliĉa, ke li restas.

Kaj li volis ŝin danki — kun dankemo kaj kun ankoraŭ unu sento, tiagrade al li nekonata, ke li eĉ ne sciis ĝin nomi, ĉar ĝi estis simple humileco. Sed la antaŭa ekscito tiel elĉerpis liajn fortojn, ke li ne povis paroli kaj dankis ŝin nur per la okuloj, en kiuj brilis ĝojo, ke li restas kun ŝi kaj ke li povos rigardi ŝin morgaŭ, postmorgaŭ, eble longe. Lian ĝojon konfuzis nur la timo perdi tion, kion li ricevis, la timo tiel granda, ke kiam post momento Ligia denove donis al li akvon kaj kiam kaptis lin ĉe tio la deziro ĉirkaŭpreni ŝian manon — li timis tion fari — li, tiu sama Vinicio, kiu dum la festeno ĉe la imperiestro perforte kisis ŝian buŝon, kaj post ŝia forkuro promesis al si, ke li trenos ŝin je la haroj en sian dormoĉambron, aŭ ordonos ŝin vipi.



## Ĉapitro 24<sup>a</sup>

Sed li komencis timi, ke iu malbonvena helpo el ekstere ne detruu lian ĝojon. Ĥilono povis sciigi lian malaperon al la prefekto de la urbo aŭ al liaj liberigitoj hejme — kaj en tia okazo invado de la *vigiloj* estis verŝajna. Lian kapon trakuris vere la penso, ke tiam li povus ordoni kapti Ligian kaj fermi ŝin en sia domo, sed li sentis, ke tion li ne faru — kaj ne kapablu fari. Li estis homo tiraneca, aŭdaca, sufiĉe malĉasta kaj laŭbezone eĉ senindulga, tamen li estis nek Tigeleno, nek Nerono. La militista vivo lasis en li certan senton de justeco, honesteco kaj tiom da konscienco, ke li komprenis, ke tia ago estus monstre malnobla. Eble li ja kapablu plenumi ĝin en atako de furiozo, estante plenforta, sed en ĉi tiu momento li estis kune korduŝita kaj malsana, do li nur deziris, ke nenio staru inter li kaj Ligia.

Kaj li rimarkis kun iom da miro, ke de la momento, kiam Ligia pledis por li, nek ŝi mem, nek Krispo postulis de li iajn garantiojn, tute kvazaŭ ili estus certaj, ke en okazo de bezono defendos ilin iu supernatura forto. Viniĉio, en kies kapo — de kiam li aŭdis en Ostriano la instruadon kaj rakonton de la apostolo — la diferenco inter aferoj eblaj kaj neeblaj komencis sin konfuzi kaj malklar-

iĝi, kaj li ne tre malkredis la supozon, ke tiel povus esti. Tamen, konsiderante la aferon pli sobre, li mem memorigis al ili, kion li diris pri la greko, kaj denove ekpostulis, ke oni venigu al li Ĥilonon.

Krispo konsentis tion kaj oni decidis sendi Urson. Vinicio, kiu en la lastaj tagoj antaŭ Ostriano ofte, kvankam sensukcese, sendadis siajn sklavojn al Ĥilono, precize indikis al la ligio ties loĝejon; poste, skribinte kelkajn vortojn sur tabuleto, li diris, sin turnante al Krispo:

— Mi donas tabuleton, ĉar li estas homo suspektema kaj ruza, kiu ofte, vokite de mi, respondadis al miaj sklavoj, ke li ne estas hejme; kaj tion li faradis ĉiufoje kiam, ne havante por mi bonan novaĵon, li timis mian koleron.

— Se mi lin nur trovos, mi venigos lin, ĉu li volos aŭ ne, — respondis Urso.

Poste, surmetinte la mantelon, li haste eliris.

Trovi iun en Romo ne estis facile, eĉ kun plej bonaj indikoj; sed Urson helpadis en tiaj okazoj la instinkto de arbarano kaj ankaŭ lia grandega kono de la urbo, tiel ke post kelka tempo li troviĝis en la loĝejo de Ĥilono.

Li tamen ne rekonis la grekon. Antaŭe li vidis tiun nur unu fojon kaj nokte. Krome, tiu honorinda kaj dignoplena maljunulo, kiu inklinigis lin mortigi Glaŭkon, tiel malsimilis ĉi tiun grekon, ĝistere kurbiĝintan pro teruro,

ke neniu povus supozi, ke la du estas unu persono. Ĥilono mem, rimarkinte, ke Urso rigardas lin kiel tute fremdan homon, ekregis iom la unuan impreson. Ĉe la vido de la tabuleto kun la skribo de Vinicio li trankviliĝis ankoraŭ pli. Ne minacis lin almenaŭ la suspekto, ke li intence enembuskigis Vinicion. Li ekpensis ĉe tio, ke la kristanoj ne mortigis Vinicion videble tial, ke ili ne kuraĝis levi la manon kontraŭ tiel eminentan personon.

«Sekve Vinicio min ŝirmos, se bezone», li diris al si interne, «ĉar li ja ne vokas min por lasi min mortigi.»

Inspirite de ioma kuraĝo, li demandis:

— Bona homo, ĉu mia amiko, la nobla Vinicio, ne sendis por mi portilon? Miaj piedoj estas ŝvelintaj kaj mi ne povas iri tiel malproksimen.

— Ne, — respondis Urso, — ni piediros.

— Kaj se mi rifuzos?

— Ne faru tion, ĉar ci devas iri.

— Kaj mi iros, sed pro mia propra inklino. Alie neniu min devigus, ĉar mi estas homo libera kaj amiko de la prefekto de la urbo. Cetere, kiel saĝulo mi posedas rimedojn kontraŭ perforto — kaj mi scias sorĉi homojn en arbojn kaj en bestojn. Sed mi iros — mi iros! Mi nur surmetos pli varman mantelon kaj kapuĉon, por ke ne rekonu min la sklavoj de ĉi tiu kvartalo; alie oni senĉese haltigadus

nin por kisi miajn manojn.

Dirinte ĉi tion, li surmetis alian mantelon, kaj la kapon kovris per vasta gaŭla kapuĉo, timante, ke Urso rememoros liajn trajtojn, kiam ili eliros en pli grandan lumon.

— Kien ci min kondukas? — li demandis envoje Urson.

— En Transtiberon.

— Mi estas nelonge en Romo kaj neniam mi tie estis, sed ankaŭ tie loĝas certe homoj, kiuj amas virton.

Sed Urso, kiu estis homo naiva kaj kiu aŭdis Vinicion diri, ke la greko ĉeestis kun li en la ostriana tombejo kaj poste vidis, kiel li eniris kun Krotono la domon, en kiu loĝis Ligia, haltis por momento kaj diris:

— Ne mensogu, maljuna homo, ĉar hodiaŭ ci estis kun Vinicio en Ostriano kaj antaŭ nia pordego.

— Ha, — diris Ĥilono, — do via domo staras tie, en Transtibero? Mi estas en Romo de nelonge kaj mi ne scias bone la nomojn de diversaj kvartaloj. Jes, amiko! Mi estis antaŭ via pordego kaj en la nomo de la virto mi petegis Vinicion, ke li ne eniru. Mi estis ankaŭ en Ostriano, kaj ĉu ci scias, kial? Jen de certa tempo mi klopodas por konverti Vinicion kaj mi volis, ke li aŭskultu la plej aĝan el la apostoloj. La lumo penetru en lian animon, kaj — en la cian! Ci ja estas kristano kaj ci ja volas, ke la vero superregu malveron?

— Jes, — respondis humile Urso.

La kuraĝo de Ĥilono tute reviviĝis.

— Vinicio estas potenca sinjoro, — li diris, — kaj amiko de la imperiestro. Ofte li obeas ankoraŭ inspirojn de malbona spirito, se tamen nur unu haro falus de lia kapo, la imperiestro venĝus kontraŭ ĉiuj kristanoj.

— Nin gardas pli granda potenco.

— Prave, prave! Sed kion vi intencas fari pri Vinicio? — demandis Ĥilono kun nova maltrankvilo.

— Mi ne scias. Kristo ordonas pardonemon.

— Tion ci bonege diris. Memoru ĉiam pri tio, alie ci estos fritata en la infero, kiel kolbaso sur pato.

Urso suspiris, kaj Ĥilono ekpensis, ke pri tiu ĉi homo, terura en la unua momento de kolero, li povus ĉiam fari, kion li volus.

Volante do scii, kiel la afero okazis ĉe la atako kontraŭ Ligia, li demandis plu per la voĉo de severa juĝisto.

— Kion vi faris pri Krotono? Parolu kaj ne mensogu.

Urso suspiris duafoje.

— Vinicio diros tion al ci.

— Tio signifas, ke ci batis lin per ponardo aŭ mortigis per bastono?

— Mi estis senarma.

La greko ne povis tamen kontraŭstari admiron pro la

superhoma forto de la barbaro.

— Plutono cin ... Tio estas, mi volis diri, Kristo cin pardonu.

Dum kelka tempo ili iris en silento, post kio Ĥilono ekparolis:

— Ne mi cin perfidos, sed gardu cin kontraŭ la *vigiloj*.

— Mi timas Kriston, ne la *vigilojn*.

— Prave. Ne ekzistas pli granda kulpo ol mortigo. Mi preĝos por ci, sed mi ne scias, ĉu eĉ miaj preĝoj ion helpos — eble nur, se ci ĵuros, ke neniam en la vivo ci iun tuŝos per la fingro.

— Mi ja ne mortigis lin intence, — respondis Urso.

Ĥilono tamen, kiu deziris sekurigi sin por ĉia eventuala, ne ĉesis plue abomenigi al Urso mortigon kaj insisti, ke tiu faru la ĵuron. Ankaŭ pri Vinicio li demandis, sed la ligio respondadis liajn demandojn malvolonte, ripetante, ke el la buŝo de Vinicio mem li aŭdos, kion li devas aŭdi. Tiel interparolante, ili trairis fine la longan vojon, dividantan la loĝejon de Ĥilono de Transtibero, kaj troviĝis antaŭ la domo. La koro de Ĥilono denove ekbatis maltrankvile. Pro timo ŝajnis al li, ke Urso komencas direkti al li iajn avidajn rigardojn. «Malgranda estos mia konsolo,» — li parolis al si mem, — «se li min mortigos senintence, kaj mi preferus ĉiuokaze, ke lin trafu paralizo kaj kune kun li

ĉiujn ligiojn, kion faru, Zeŭso, se ci scipovos». Tiel meditante, li envolvis sin ĉiam pli en sian gaŭlan mantelon, ripetante, ke li timas la malvarmon. Fine, kiam, transirinte la vestiblon kaj la unuan korton, ili troviĝis en la koridoro, kondukanta al la ĝardeno de la dometo, li haltis subite kaj diris:

— Lasu min ekspiri, aŭ mi ne povos paroli kun Vinicio kaj helpi lin per edifaj konsiloj.

Dirinte tion, li haltis — ĉar kvankam li ripetadis al si, ke nenio lin minacas, tamen je la penso, ke li staros inter tiuj misteraj homoj, kiujn li vidis en Ostriano, liaj piedoj iom tremis sub li.

Dume el la dometo atingis liajn orelojn kantado.

— Kio estas ĉi tio? — li demandis.

— Ci diras, ke ci estas kristano, kaj ci ne scias, ke ni kutimas post ĉiu manĝo glori la Savinton per nia kantado, — respondis Urso. — Mirjam' kaj ŝia filo jam verŝajne revenis kaj eble ankaŭ la apostolo estas kun ili, ĉar li vizitadas ĉiutage la vidvinon kaj Krispon.

— Konduku min rekte al Vinicio.

— Vinicio estas en unu ĉambro kun ĉiuj, ĉar ĝi estas la sola sufiĉe granda; la ceteraj ĉambroj estas malgrandaj kaj senlumaj, tien ni iras nur por dormi. Ni jam eniru — tie ci ripozos.

Kaj ili eniris. En la ĉambro estis krepuske, la vespero estis nuba, vintra, kaj la flamo de kelkaj meĉlampoj nesufiĉe disigadis la mallumon. Vinicio plie divenis ol rekonis en la kapuĉkovrita homo Ĥilonon, kaj ĉi tiu, ekvidinte en la angulo de la ĉambro liton, kaj sur ĝi Vinicion, ekiris, ne rigardante la aliajn, rekte al li — kvazaŭ opiniante, ke apud Vinicio li estos plej sekura.

— Ho sinjoro! Kial ci ne obeis miajn konsilojn! — li vokis, plektante la manojn.

— Silentu, — diris Vinicio, — kaj aŭskultu!

Poste li komencis penetre rigardi en la okulojn de Ĥilono kaj paroli malrapide kaj akcente, kvazaŭ li volus, ke ĉiu lia vorto estu komprenita kiel ordono kaj restu eterne en la memoro de Ĥilono.

— Krotono atakis min por min murdi kaj rabi — ci komprenas! Tiam mi mortigis lin, kaj tiuj ĉi homoj prizorgis la vundojn, kiujn mi ricevis de li, batalante.

Ĥilono tuj ekkomprenis, ke se Vinicio tiel parolas, li tion faras sendube sekve de interkonsento kun la kristanoj, kaj en tiu okazo li volas, ke oni lin kredu. Li ekkonis tion ankaŭ el lia vizaĝo, do en unu momento, montrante nenian dubon, nek miron, li levis la okulojn supren kaj ekkriis:

— Li ja estis konata fripono, sinjoro! Mi ja avertis cin,



ke ci ne fidu al li. Ĉiuj miaj instruoj rebatis sin de lia kapo, kiel pizo de muro. En la tuta Hadeso oni ne trovos por li sufiĉajn turmentojn. Ĉar kiu ne povas esti honesta homo, tiu certagrade devas esti fripono, kaj al kiu estas pli malfacile iĝi honesta ol al fripono? Sed ataki sian bonfaranton kaj tiel grandaniman sinjoron ... Ho dioj!...

Ĉe tio li tamen rememoris, ke envoje li prezentis sin al Urso kiel kristano — kaj li eksilentis.

Vinicio diris:

— Se mi ne kunhavas mian *sikon*<sup>228</sup>, li min mortigus.

— Mi benas la momenton, en kiu mi konsilis al ci preni almenaŭ ponardon.

Sed Vinicio direktis al la greko esploran rigardon kaj demandis:

— Kion ci faris hodiaŭ?

— Kiel do? Ĉu mi ne diris al ci, sinjoro, ke mi faris voĵojn por cia sano?

— Kaj nenion pli?

— Kaj mi ĝuste intencis cin viziti, kiam tiu bona homo venis kaj diris al mi, ke ci min vokas.

— Jen estas tabuleto. Iru kun ĝi en mian domon, serĉu mian liberigiton kaj transdonu ĝin al li. Estas sur ĝi skribite, ke mi veturis en Beneventon. Diru al Demaso en cia

<sup>228</sup> Latine *sica* — larĝa ponardo traca-daka-iliria, disvastiĝinta en la tuta Romio.

propra nomo, ke mi faris tion hodiaŭ matene, vokite per urĝa letero de Petronio.

Kaj li ripetis akcente:

– Mi veturis en Beneventon, ĉu ci komprenas?

– Ci veturis, sinjoro! Matene mi ja adiaŭis cin ĉe la pordego Kapena – kaj de la tempo de cia forveturo tia sopiro min regas, ke, se cia grandanimeco ne konsolos ĝin, mi mortos pro ploro, kiel la malfeliĉa edzino de Zeto post la morto de Itilo<sup>229</sup>.

Vinicio, kvankam malsana kaj kutimiĝinta al la fleksemo de la greko, tamen ne povis sin deteni de rideto. Li estis, krome, kontenta, ke Ĥilono tuj lin komprenis, li do diris:

– Sekve mi alskribos, ke oni sekigu ciajn larmojn. Donu al mi lampon.

Ĥilono, jam tute trankviliĝinta, leviĝis kaj, farinte kelkajn paŝojn al la kameno, deprenis unu el la meĉlampoj, brulantaj sur la kamenmuro.

Sed kiam ĉe tiu ago la kapuĉo deŝoviĝis de lia kapo kaj la lumo falis rekte sur lian vizaĝon, Glaŭko saltleviĝis de benko kaj, rapide proksimiĝinte, ekstaris antaŭ li.

<sup>229</sup> Aedono, ŝanĝita en najtingalon (*Noto de la aŭtoro*).

Laŭ mito, Aedono (Ἄηδών), la edzino de la Teba heroo Zeto (Ζήθος), pro envio provis mortigi la plej aĝan filon de sia bofratino Niobo, sed eraris kaj mortigis sian solan filon Itilon (Ἴτυλον). Kompatante ŝian doloron la dioj ŝin ŝanĝis en najtingalon.

— Ĉu ci rekonas min, Kefaso<sup>230</sup>? — li demandis.

Kaj en lia voĉo estis io tiel terura, ke tremo trakuris ĉiujn ĉeestantojn.

Ĥilono levis la lampon kaj ellasis ĝin preskaŭ je la sama momento — poste li kurbiĝis ĝis la tero kaj komencis ĝemi:

— Mi ne estas ... mi ne estas ... kompaton!

Glaŭko sin turnis al la vespermanĝantoj kaj diris:

— Jen estas la homo, kiu sklavigis kaj pereigis min kaj mian familion!...

Lia historio estis konata al ĉiuj kristanoj kaj al Vinicio, kiu nur tial ne divenis, kiu estas tiu Glaŭko, ĉar, senĉese svenante pro doloro dum la prizorgado de la vundoj, li ne aŭdis lian nomon. Sed por Urso ĉi tiu mallonga momento, ligite kun la vortoj de Glaŭko, estis kvazaŭ fulmo-brilo en mallumo. Rekoninte Ĥilonon, per unu salto li troviĝis apud la greko, lin kaptis je la brakoj kaj, turninte ilin malantaŭen, ekkriis:

— Jen tiu, kiu instigis min mortigi Glaŭkon!

— Kompaton! — ĝemis Ĥilono, — mi redonos al vi ... Sinjoro! — li vokis, turnante la kapon al Vinicio, — savu min! Mi fidis al ci! Ekparolu por mi ... Cian leteron mi portos, sinjoro! Sinjoro!

<sup>230</sup> La aramea nomo [kēpā], grekigite Κηφᾶς (Kefas [Joh 1:42, 1Kor, Gall]), latinigite *Cephas* (en QP1 *Cefas*).

Sed Vinicio plej indiferente el ĉiuj rigardis tion, kio okazas — unue tial, ke ĉiuj aferoj de la greko estis al li konataj, kaj due, ĉar lia koro ne sciis, kio estas kompatato. Li diris:

— Enterigu lin en la ĝardeno: la leteron portos iu alia.

Al Ĥilono ekŝajnis, ke tiuj vortoj estas la lasta verdikto.

Liaj ostoj komencis kraki en la teruraj manoj de Urso, la okuloj nebuliĝis pro larmoj de doloro.

— Je via Dio! Kompaton! — li ĝemis. — Mi estas kristano!... Paco kun vi! Mi estas kristano, kaj se vi ne kredas al mi, baptu min ankoraŭfoje, ankoraŭ du, ankoraŭ dek fojojn! Glaŭko! Tio estas eraro! Lasu min paroli! Igu min sklavo ... Ne mortigu min! Kompaton!...

Kaj lia voĉo, sufokata de la doloro, iĝadis ĉiam pli malforta, kiam subite malantaŭ la tablo sin levis la apostolo Petro; dum momento li balancis sian blankan kapon, mallevante ĝin al la brusto, kaj havis la okulojn fermitaj; sed poste li malfermis ilin kaj diris meze de silento:

— Jene diris al ni la Savinto: «Se cia frato pekus kontraŭ ci, admonu lin; kaj se li pentus, pardonu lin. Kaj se li sepfoje tage pekus kontraŭ ci kaj sepfoje revenus al ci, dirante: mi pentas! — pardonu lin.»

Poste iĝis silento ankoraŭ pli granda. Glaŭko staris

dum longa tempo kun vizaĝo kovrita per la manoj, fine li reprenis ilin kaj diris:

— Kefaso, Dio al ci pardonu la malbonojn, kiujn ci faris al mi, kiel mi ilin pardonas al ci en la nomo de Kristo.

Kaj Urso, liberiginte la brakojn de Ĥilono, tuj aldonis:

— Estu al mi la Savinto tiel kompatema, kiel ankaŭ mi cin pardonas.

Ĥilono falis sur la teron kaj, apogite sur ĝi per la manoj, turnadis la kapon, kiel besto kaptita en reton, rigardante ĉirkaŭen kaj atendente, de kie venos la morto. Li ankoraŭ ne kredis siajn okulojn kaj orelojn, kaj ne kuraĝis esperi pardonon.

Sed iom post iom li reakiris la konscion, nur liaj bluiĝintaj lipoj plu tremis pro teruro. Dume la apostolo diris:

— Foriru en paco.

Ĥilono leviĝis, sed ankoraŭ ne povis paroli. Malgraŭvole li proksimiĝis al la lito de Vinicio, kvazaŭ plu serĉante ties helpon — ĉar ĝis nun li ne havis tempon ekpensi, ke Vinicio, kiu ja uzis liajn servojn kaj estis kvazaŭ lia kunkulpulo, lin kondamnis; dum tiuj ĝuste, kontraŭ kiuj li servis, pardonis. Tiu penso estis venonta al li poste. Dume en lia rigardo vidiĝis nur miro kaj nekredo. Kvan-kam li jam ekkonis, ke oni lin pardonis, tamen li volis plej baldaŭ foriĝi el inter tiuj nekompreneblaj homoj, kies

boneco teruris lin preskaŭ egale, kiel lin terurus krueleco. Ŝajnis al li, ke se li restus pli longe, okazus denove io neatendita, do, stariĝinte apud Vinicio, li komencis paroli per interrompata voĉo:

— Donu la leteron, sinjoro! Donu la leteron!

Kaj kaptinte la tabuleton, kiun Vinicio al li donis, li riverencis foje al la kristanoj, duafoje al Vinicio, kaj ŝtele glitante tuj ĉe la muro, elkuris eksteren.

En la ĝardeneto, kiam ĉirkaŭigis lin mallumo, teruro denove hirtigis la harojn sur lia kapo, ĉar li estis certa, ke Urso elkuros post li kaj mortigos lin en la ombroj de la nokto. Li forkurus per ĉiuj fortoj, sed la piedoj rifuzis lin obei kaj post momento iĝis tute rigidaj, ĉar Urso efektive ekstaris apud li. Ĥilono falis surprizaĝen kaj komencis ĝemi:

— Urbano ... en la nomo de Kristo...

Sed Urbano diris:

— Ne timu. La apostolo ordonis al mi konduki cin ekster la pordegon, kaj se mankas al ci fortoj, mi akompanos cin hejmen.

Ĥilono levis la vizaĝon.

— Kion ci diras? Kion? Ci ne mortigos min?

— Mi cin ne mortigos, kaj se mi kaptis cin tro forte kaj dolorigis ciajn brakojn, pardonu min.

— Helpu min leviĝi, — diris la greko. — Ci ne mortigos min? Ĉu? Elkonduku min en la straton, kaj pluen mi iros sola.

Urso levis lin de la tero facile, kiel plumon, lin starigis sur la piedojn, poste elkondukis tra la malluma pasejo en la duan korton, el kiu oni iris en la vestiblon kaj sur la straton. En la koridoro Ĥilono denove ripetadis al si interne: «Mi estas perdita!» kaj nur kiam ili troviĝis sur la strato, li iom trankviliĝis kaj diris:

— Mi iros pluen sola.

— Paco estu kun ci.

— Kaj kun ci! Kaj kun ci!... Lasu min ekspiri.

Kaj post la foriro de Urso li ekspiris plenbruste. Per la manoj li palpis sian zonon kaj koksojn, kvazaŭ volante konvinkiĝi, ke li vivas, kaj per rapidaj paŝoj ekiris antaŭen.

Sed, farinte kelkdek paŝojn, li haltis kaj diris:

— Kial ili min tamen ne mortigis?

Kaj malgraŭ tio, ke jam kun Eŭrikio li parolis pri la kristana instruo, malgraŭ la interparolo kun Urbano apud la rivero kaj malgraŭ ĉio, kion li aŭdis en Ostiano, li ne povis trovi respondon al tiu demando.

## Ĉapitro 25<sup>a</sup>

Ankaŭ Vinicio ne povis klarigi al si la okazintan, kaj en la fundo de la animo li miris preskaŭ tiom kiel Ĥilono. Ĉar, ke kun li mem oni agis tiel, kiel oni agis, kaj anstataŭ venĝi kontraŭ li por tiu atako, zorgeme sin okupis pri liaj vundoj, tion li atribuis parte al la instruo, kiun ili konfesis, pli multe al Ligia, kaj iom ankaŭ al sia alta rango. Sed ilia konduto rilate al Ĥilono simple superis liajn konceptojn pri la homa pardonpovo. Malgraŭvole al li trudiĝis la demando, kial ili ne mortigis la grekon? Ili ja povus fari tion senpune.

Urso enterigus lin en la ĝardeno aŭ portus nokte en Tiberon, kiu en tiu tempo de noktaj banditagoj, plenumataj de la imperiestro mem, tiel ofte surbordigadis matene homajn korpojn, ke neniu eĉ esploris ilian devenon. Krom tio, laŭ Vinicio, la kristanoj ne nur povis, sed eĉ devis mortigi Ĥilonon.

Kompato ne estis tute fremda al tiu mondo, al kiu apartenis la juna patricio. La atenanoj ja konstruis al ĝi altaron kaj dum longa tempo rezistis enkondukon de la gladiatoraj luktoj en Atenon. Okazis iafoje, ke eĉ en Romo venkitoj ricevis pardonon, kiel ekzemple Kalikrato, la reĝo de la britoj, kiu, militkaptite de Klaŭdio kaj malavare



de li dotite, libere loĝis en la Urbo. Sed venĝo pro personaj malbonagoj ŝajnis al Vinicio, same kiel al ĉiuj aliaj, prava kaj justa. Rezigni ĝin estis kontraŭ lia animo. Li ja aŭdis, vere, en Ostriano, ke oni devas ami eĉ siajn malamikojn; li tamen konsideris tion kiel teorion ne havantan signifon en la vivo.

Kaj ankoraŭ lian kapon trakuris la penso, ke eble oni ne mortigis Ĥilonon nur tial, ke estis ia festperiodo aŭ lunfazo, dum kiu la kristanoj ne rajtas mortigi. Li aŭdis, ke estas tiaj tempodaŭroj, en kiuj al diversaj nacioj ne estas permesite eĉ komenci militon. Sed kial en tiu okazo oni ne transdonis la grekon al tribunalo, kial la apostolo diris, ke se iu pekus sepfoje, oni devus sepfoje lin pardoni, kaj kial Glaŭko diris al Ĥilono: «Dio cin tiel pardonu, kiel mi cin pardonas»?

Ĥilono faris al Glaŭko la plej teruran malbonon, kian unu homo povas fari al alia, kaj en Vinicio ĉe la nura penso pri tio, kion li farus al homo kiu, ekzemple, mortigus Ligian, la koro ekbolis de kolero: ne estas tiaj torturoj, per kiuj li ŝin ne venĝus! Sed Glaŭko pardonis! Kaj ankaŭ Urso pardonis — li, kiu efektive povus senpune mortigi en Romo, kiun ajn li volus, ĉar poste li bezonus nur mortigi la reĝon de la Nemorena bosko<sup>231</sup> kaj okupi lian lokon. Ĉu

<sup>231</sup> «Nemorena reĝo» (lat. *Rex Nemorensis*) estis pastro de Diano kaj de la sankta bosko ĉe la Nemorena lago (lat. *Nemorensis lacus*, itale *Lago di*

al la homo, al kiu ne rezistis Krotono, rezistus la gladiatoro, tenanta tiun rangon, kiun oni akiris nur per mortigo de la antaŭa «reĝo»?

Unu sola respondo estis al ĉiuj tiuj demandoj. Nome, ke ili ne mortigis pro boneco tiel granda, ke simila ne ekzistis ĝis nun en la mondo, kaj pro senlima amo al la homoj, kiu ordonis al ili forgesi sin mem, faritajn al ili malpravojn, sian feliĉon kaj sian malbonsorton — kaj vivi por aliaj. Kian rekompencon tiuj homoj devis ricevi, Vinicio aŭdis en Ostriano; sed tion li ne povis enkapigi. Li sentis anstataŭe, ke tiu tera vivo, ligita kun la devo rezigni por la bono de aliaj ĉion plaĉan kaj voluptan, devus esti mizera. Tial en tio, kion li pensis ĉi-momente pri la kristanoj, estis krom mirego ankaŭ kompatato, kaj kvazaŭ nuanco de malestimo. Ŝajnis al li, ke ili estas ŝafoj, nepre pli aŭ malpli frue formanĝotaj de lupoj, kaj lia romana naturo ne kapablis trovi en si respekton por tiuj, kiuj lasas sin formanĝi. Frapis lin tamen unu afero. Nome, post la eliro de Ĥilono ia profunda ĝojo heligis ĉiujn vizaĝojn. La apostolo proksimiĝis al Glaŭko kaj, metinte la manon sur lian kapon, diris:

— Kristo venkis en ci!

---

*Nemi*). Kutime tiun funkcion plenumis eskapinta sklavo aŭ jure persekutata krimulo; la ofico lin imunigis. Tamen ĉiu ajnulo ratis lin mortigi en duelo kaj sukcedi (kaj tiel akiri rifuĝon).

Kaj Glaŭko levis supren la okulojn tiel plenaj je fido kaj ĝojo, kvazaŭ verŝiĝus sur lin grandega, neatendita felîco. Vinicio, kiu komprenis nur ĝojon pro plenumita venĝo, rigardis lin per pupiloj vastigitaj de febro, iom tiel, kiel li rigardus frenezulon. Li vidis tamen, kaj li vidis tion ne sen interna indigno, kiel poste Ligia alpremis siajn reĝidajn lipojn al la mano de tiu homo, kies aspekto similis tiun de sklavo, kaj ŝajnis al li, ke la ordo de la mondo tute renversiĝas. Poste revenis Urso kaj komencis rakonti, kiel li elkondukis Hîlonon sur la straton kaj kiel li petis de li pardonon por la malbono, kiun li povis fari al liaj brakoj, por kio la apostolo ankaŭ lin benis, kaj Krispo deklaris, ke ĉi tio estis tago de granda venko. Ekaŭdinte pri tiu venko, Vinicio tute perdis la ordon de siaj pensoj.

Kiam Ligia denove alportis al li refreŝigan trinkaĵon, li retenis momente ŝian manon kaj demandis:

— Do ankaŭ ci min pardonis?

— Ni estas kristanoj. Ni ne rajtas teni koleron en la koro.

— Ligia, — li diris tiam, — kiu ajn estas cia dio, mi honoros lin per hekatombo, nur tial, ke li estas cia dio.

— Ci honoros lin en cia koro, kiam ci lin ekamos.

— Nur tial, ke li estas cia dio, — ripetis Vinicio per malforta voĉo.

Kaj li mallevis la palpebrojn, ĉar denove ekposedis lin svenemo.

Ligia foriris, sed post momento ŝi revenis kaj, stariĝinte proksime, kliniĝis super li por vidi ĉu li dormas. Viniĉio eksentis ŝian proksimecon kaj, malferminte la okulojn, ekridetis; Ligia facile metis sur ilin la manon, kvazaŭ volante inklinigi lin al dormo. Tiam ekregis lin granda dolĉeco, sed samtempe li sentis sin pli malsana. Kaj tiel estis efektive. Jam plene noktiĝis, kaj kune venis pli forta febro. Pro tio li ne povis endormiĝi kaj sekvis Ligian per la okuloj, kien ajn ŝi moviĝis.

Kelkfoje li tamen falis en duondormon, en kiu li vidis kaj aŭdis ĉion, kio okazis ĉirkaŭ li, sed en kiu la realeco miksiĝis kun febraj vizioj. Ŝajnis do al li, ke en iu malnova, forlasita tombejo staras turforma sanktejo, kie Ligia estas pastrino. Kaj li ne deturnis de ŝi la okulojn, sed li vidis ŝin sur la supro de la turo, kun liuto en la mano, tutan en lumo, similan al la pastrinoj kiuj nokte kantis himnojn al la luno kaj kiujn li vidadis en Oriento. Li mem grimpis kun granda peno sur serpentuma ŝtuparo por ŝin forkapti, kaj post li rampis Ĥilono, klakante per la dentoj pro teruro kaj ripetante: «Ne faru tion, sinjoro, ĉar ŝi estas pastrino, pro kiu li venĝos...!» Ne sciante, kiu estas tiu «li», Vinicio tamen komprenis, ke li mem estas plenumonta

sakrilegion, kaj ankaŭ sentis senmezuran teruron. Sed kiam li atingis la balustradon, ĉirkaŭantan la supron de la turo, apud Ligia subite ekstaris la apostolo kun la arĝenta barbo kaj diris: «ne levu kontraŭ ŝin cian manon, ĉar ŝi apartenas al mi». Kaj, dirinte tion, li ekiris kun ŝi straton el lunlumo, kvazaŭ vojon al la ĉielo, kaj li, Vinicio, etendinte al ili la manojn, komencis petegi, ke ili lin kunprenu.

Ĉi tiam li vekiĝis, rekonsciiĝis kaj komencis rigardi antaŭ sin. La fajro sur la alta fajroplato ardis jam malpli forte, sed ĵetis brilojn ankoraŭ sufiĉe vivajn, kaj ili ĉiuj sidis ĉe la kameno, varmigante sin, ĉar la nokto estis frosteta kaj la ĉambro nesufiĉe varma. Vinicio vidis iliajn spirtojn eliri el la buŝoj en la formo de vapore. En la mezo sidis la apostolo; ĉe liaj genuoj, sur malalta tabureto, Ligia; poste Glaŭko, Krispo, Mirjam', kaj ĉe la fino unuflanke Urso, aliflanke Nazario, la filo de Mirjam', juna knabo kun belega vizaĝo kaj nigraj haroj longaj ĝis la ŝultroj.

Ligia aŭskultis kun okuloj levitaj al la apostolo, kaj ĉiuj kapoj estis turnitaj al li, dum li ion parolis duonvoĉe. Vinicio komencis rigardi lin kun certa superstiĉa timo, ne multe malpli granda ol tiu teruro, kiun li sentis en la febra vizio. Kaj li pensis, ke en la febro li sentis veron, ke tiu maljuna veninto el malproksima lando efektive forprenas de li Ligian kaj kondukas ŝin sur iajn nekonatajn voj-

ojn. Li ankaŭ certis, ke la maljunulo parolas pri li, kaj eble konsilas, kiel disigi lin de Ligia, ĉar ŝajnis al Vinicio tute neeble, ke iu povus paroli pri io alia; do, streĉinte la tutan atenton, li komencis aŭskulti la vortojn de Petro.

Li tamen plene eraris, ĉar la apostolo denove parolis pri Kristo.

«Ili vivas per ĉi tiu nomo!» ekpensis Vinicio.

La maljunulo rakontis pri la kapto de Kristo:

— Venis roto kaj pastraj servistoj por lin kapti. Kiam la Savinto demandis ilin, kiun ili serĉas, tiuj diris: «Jesuon Nazaretan!» Sed kiam li diris al ili: «Mi estas!» — ili falis teren, ne kuraĝante levi kontraŭ lin la manojn, kaj nur post refoja demando ili lin kaptis.

Ĉi tiam la apostolo sin interrompis kaj, etendinte la manojn al la fajro, li diris:

— La nokto estis malvarma, kiel hodiaŭ, sed mia koro ekbolis, do mi eligis glavon por lin defendi, kaj mi fortranĉis la orelon al servisto de la ĉefpastro. Kaj mi defendus lin pli ol mian propran vivon, se li ne dirus al mi: «Metu la glavon en ĝian ingon. Ĉu la kalikon, kiun la Patro al mi donis, mi ne trinkos?» ... Tiam ili kaptis lin kaj ligis...

Dirinte ĉi tion, li metis la manojn al la frunto kaj eksilentis, volante antaŭ la plua rakontado ekregi la forton de

la rememoroj. Sed Urso, ne povante sin deteni, saltleviĝis, plibonigis per fera stango la fajron sur la fajroplato, tiel ke fajreroj ekŝprucis orpluve kaj la flamo pli vive eksaltis, poste li sidiĝis kaj ekkriis:

— Kio ajn tiam okazus — ha!...

Sed li haltis subite, ĉar Ligia metis la fingron sur la buŝon. Li nur spiris laŭtege, kaj oni vidis, ke li ribelas en la animo, kaj ke kvankam ĉiam li estas preta fali al la piedoj de la apostolo, tamen tiun solan agon li ne povas en la animo aprobi, ĉar se okazus, ekzemple, ke en lia ĉeesto iu atakus la Savinton, se li estus kun li en tiu nokto, ho, kiel li batus tiam la soldatojn, kaj la pastrajn servistojn, kaj la oficistojn ... Kaj liaj okuloj nebuliĝis de larmoj ĉe la nura penso pri tio, same pro ĉagreno kaj pro interna batalo, ĉar unue li ekpensis, ke li ne nur defendus la Savinton, sed ankaŭ kunvokus helpe al li aliajn ligiojn, bravegajn vir-ojn, aliflanke — ke se li tion farus, li montrus malobeon al la Savinto kaj malhelpus la elaĉeton de la mondo.

Tial li ne povis reteni larmojn.

Post momento Petro, forpreninte la manojn de la frunto, komencis rakonti plu, sed Vinicion denove ekregis febra duondormo. Tio, kion li nun aŭdis, miksiĝis en lia kapo kun tio, kion la apostolo rakontis la antaŭan nokton en Ostiano pri tiu tago, kiam Kristo aperis sur la bor-

do de la Tiberiada lago. Li do vidis vaste disverŝitan ondaron, sur ĝi fiŝkaptistan boaton, kaj en la boato Petron kaj Ligian. Li mem naĝis post ili per ĉiuj fortoj, sed la doloro en la rompita brako malhelpis al li ilin atingi. Ventego komencis ĵeti la ondojn sur liajn okulojn kaj li eksentis, ke li dronas, vokante per petega voĉo helpon. Tiam Ligia surgenuiĝis antaŭ la apostolo, kaj tiu turnis la boaton kaj etendis al li remilon, kiun kaptinte, li eniĝis kun ilia helpo en la boaton kaj falis sur ĝian fundon.

Sed poste ŝajnis al li, ke, leviĝinte, li ekvidis amason da homoj naĝantaj post la boato. La ondoj kovris per ŝaŭmo iliajn kapojn; kelkajn oni jam vidis nur etendi la manojn el la akva ĥaoso, sed Petro fojon post fojo savadis la dronantojn kaj prenadis ilin en la boaton, kiu iĝadis, kva-zaŭ mirakle, ĉiam pli granda. Baldaŭ la boaton plenigis homamaso tiel granda, kiel tiu, kiu kunvenis en Ostriano, kaj poste ankoraŭ pli granda. Vinicio miris, kiel ĝi povis trovi tie lokon, kaj li ektimis, ke ili subakviĝos. Sed Ligia komencis lin trankviligi kaj montris al li lumon sur malproksima bordo, al kiu ili naĝis.

Ĉe tio la sonĝobildoj de Vinicio denove miksiĝis kun tio, kion li aŭdis en Ostriano el la buŝo de la apostolo, kiel foje Kristo montris sin ĉe la lago. Do nun li vidis en tiu surborda lumo iun figuron, al kiu Petro direktis la boaton.



Kaj laŭgrade kiel ili proksimiĝadis al ĝi, la vetero iĝadis pli kvieta, la ondaro pli ebena kaj la lumo pli granda. La amaso komencis kanti dolĉan himnon, la aero pleniĝis per laodoro de nardo; la akvo brilis ĉielarke, kvazaŭ el la fundo speguliĝus lilioj kaj rozoj, kaj fine la boato delikate tuŝis per sia brusto sablon. Tiam Ligia prenis lin je la mano kaj diris: «Venu, mi kondukos cin!» Kaj ŝi lin kondukis en la lumon.

Vinicio denove vekiĝis, sed la iluzioj malaperis nur iom post iom, kaj ne tuj li reakiris la konscion pri la realeco. Dum kelka tempo ŝajnis al li ankoraŭ, ke li estas sur la lagobordo kaj ke ĉirkaŭas lin homamaso, en kiu, mem ne sciante kial, li komencis serĉi Petronion kaj miris, ke li ne povas lin trovi. Tamen hela lumo el la kameno, apud kiu neniu plu estis, rekonsciigis lin komplete. Olivlignaj ŝtupoj dormeme ardis sub la rozkolora cindro, sed hakpecoj da pinio, kiujn oni videble alĵetis al la ardaĵo, ŝprucis per hela flamo, kaj en tiu brilo Vinicio ekvidis Ligian sidanta proksime al lia lito.

Ŝia vido tuŝis lin ĝis la fundo de la animo. Li memoris, ke la lastan nokton ŝi pasigis en Ostriano, poste la tutan tagon estis okupita ĉe lia flegado, kaj nun, kiam ĉiuj iris dormi, ŝi sola gardis ĉe lia lito. Facile oni povis diveni, ke

ŝi tamen estis certe laca, ĉar, sidante senmove, ŝi havis la okulojn fermitaj. Vinicio ne sciis, ĉu ŝi dormas aŭ estas profundiĝinta en pensojn. Li rigardis ŝian profilon, la mallevitajn okulharojn, la manojn, plektitajn sur la genuoj, kaj en sia idolana kapo li komencis pene koncepti, ke krom la greka kaj roma beleco, nuda, memfida kaj fiera pro sia formo, ekzistas en la mondo iu alia beleco, nova, senlime pura, en kiu estas animo.

Li ne kapablis persvadi al si nomi tiun belecon kristana, tamen, pensante pri Ligia, li ne scipovis jam apartigi ŝin de la instruo, kiun ŝi konfesis. Li eĉ komprenis, ke se ĉiuj aliaj iris dormi, kaj Ligia sola — ŝi, al kiu li faris tiom da malbono — maldormas apud li, tio estas ĉar ĉi tiu instruo ordonas tiel. Sed tiu penso, inspiranta al li admiron al la instruo, estis al li kune malagrabla. Li preferus, ke Ligia faru tion pro amo al li, al lia vizaĝo, okuloj, al lia statusimila figuro, unuvorte pro ĉiuj tiuj kaŭzoj, pro kiuj multfoje volvis sin ĉirkaŭ lia kolo neĝblankaj brakoj, grekinaj kaj romaninaj.

Subite li tamen eksentis, ke se ŝi estu tia, kiel aliaj virinoj, li jam trovus en ŝi ian mankon. Tiam li ekmiris kaj mem ne komprenis, kio pri li okazas, ĉar li rimarkis, ke ankaŭ en li komencas sin formi iaj novaj sentoj kaj novaj plaĉoj, fremdaj al la mondo, en kiu ĝis nun li vivis.

Ŝi dume malfermis la okulojn, kaj vidante, ke Vinicio ŝin rigardas, proksimiĝis al li kaj diris:

— Mi estas apud ci.

Li respondis al ŝi:

— Mi vidis en sonĝo cian animon.

## Ĉapitro 26<sup>a</sup>

La sekvintan matenon li vekiĝis malforta, sed kun kapo malvarma, sen febro. Ŝajnis al li, ke lin vekis ia flustra interparolo, sed kiam li malfermis la okulojn, Ligia ne estis plu apud li, nur Urso, klinite antaŭ la kameno, disrastis la grizan cindron kaj serĉis en ĝi ardon, kiun trovinte, li komencis disblovi la fajron tiel, kvazaŭ li farus ĝin ne per buŝo, sed per forĝista blovsako.

Vinicio, rememorinte, ke tiu homo hieraŭ venkis Krotonon, observis kun intereso, inda je amatoro de areno, lian grandegan dorson, similan al la dorso de ciklopo, kaj la femurojn, potencajn, kvazaŭ kolonoj.

«Dankon al Merkuro, ke li ne rompis al mi la nukon», li ekpensis interne. «Je Polukso! Se aliaj ligioj similas al li, la apuddanubaj legioj povos iam havi pro ili malfacilan taskon!»

Kaj laŭte li ekparolis:

— He, sklavo!

Urso forigis la kapon el la kameno kaj, ridetante preskaŭ amike, diris:

— Dio donu al ci, sinjoro, bonan tagon kaj bonan sanon, sed mi estas libera homo, ne sklavo.

Al Vinicio, kiu deziris demandi Urson pri la naskiĝlando de Ligia, tiuj vortoj faris certan plezuron, ĉar interparolo kun homo libera, kvankam simpla, malpli ofendis lian romanon kaj patrician dignon ol interparolo kun sklavo, en kiu nek la leĝo, nek la moro rekonis homan estaĵon.

— Ci do ne apartenas al Aŭlo? — li demandis.

— Ne, sinjoro. Mi servas al Kallina, kiel mi servis al ŝia patrino, sed libervole.

Ĉe tio li denove kaŝis la kapon en la kamenon por blovi iom sur la karbojn, sur kiujn li antaŭe ĵetis pecojn da ligno, poste li eltiris ĝin kaj diris:

— Ĉe ni ne estas sklavo.

Sed Vinicio demandis:

— Kie estas Ligia?

— Ŝi ĵus foriris, kaj mi devas kuiri por ci matenmanĝon, sinjoro. Ŝi maldormis apud ci la tutan nokton.

— Kial ci ne anstataŭis ŝin?

— Ĉar ŝi tiel volis, kaj mia afero estas obei.

Ĉe tio la okuloj de Urso malsereniĝis, kaj post mo-

mento li aldonis:

- Se mi ŝin ne obeus, ci ne plu vivus, sinjoro.
- Ĉu ci bedaŭras, ke ci min ne mortigis?
- Ne, sinjoro. Kristo ne ordonis mortigi.
- Kaj Ataceno? Kaj Krotono?
- Mi ne povis agi alie, — ekmurmuris Urso.

Kaj li komencis rigardi kvazaŭ kun bedaŭro siajn manojn, kiuj videble restis idolanaj, malgraŭ ke la animo akceptis la bapton.

Poste, metinte poton sur la fajroplaton kaj ekkaŭrinte antaŭ la kameno, li fiksas penseman rigardon sur la flamo.

— Tio estas cia kulpo, sinjoro, — li diris fine, — kial ci levis la manon kontraŭ ŝin, kontraŭ la reĝan filinon?

Vinicio en la unua momento ekbolis pro la ofendita fiereco, ke tiu simplulo kaj barbaro kuraĝas ne nur paroli al li tiel familiare, sed eĉ riproĉi lin. Al tiuj eksterordinaraj kaj nekredeblaj aferoj, kiuj lin trafis de la antaŭhieraŭa nokto, aliĝis ankoraŭ unu. Sed, estante malforta kaj ne havante apude siajn sklavojn, li sin ekregis, tiom pli ke la deziro ekkoni detalojn el la vivo de Ligia superis lian koleron.

Do, trankviliĝinte, li komencis demandi pri la milito de la ligioj kontraŭ Vanio kaj la svevoj. Urso volonte rakontis, sed li ne povis aldoni multe al tio, kion siatemp

Aŭlo Plaŭcio rakontis al Vinicio. Urso ne partoprenis en la batalo, ĉar li akompanis la garantiulinojn en la tendaron de Atelio Histro. Li nur sciis, ke la ligioj venkis la svevojn kaj la jazigojn, sed ilia komandanto kaj reĝo pereis de jaziga sago. Tuj poste venis la famo, ke la semnonoj bruligis la arbarojn ĉe ilia limo, do ili revenis flugrapide por venĝi la ofendon, kaj la garantiulinoj restis ĉe Atelio, kiu komence ordonis donadi al ili reĝajn honorojn. Poste la patrino de Ligia mortis. La Roma komandanto ne sciis, kion fari pri la infano. Urso volis reveni kun ĝi hejmlanden, sed la vojo estis danĝera pro sovaĝaj bestoj kaj gentoj; kiam do venis famo, ke iuj senditoj de la ligioj trovas sin ĉe Pomponio, oferante al li helpon kontraŭ la markomanoj, Histro sendis ilin al Pomponio. Alveninte al li, ili tamen eksciis, ke neniuj senditoj estis venintaj — kaj tiamaniere ili restis en la tendaro, el kie Pomponio kunprenis ilin en Romon, kaj, soleninte la triumfiron, donis la reĝan infanon al Pomponia Grecina.

Vinicio, kvankam nur etaj detaloj en la rakonto de Urso estis al li nekonataj, aŭskultis kun plezuro, ĉar lian senliman patrician fierecon agrable flatis tio, ke memvidinta atestanto konfirmis la reĝan devenon de Ligia. Kiel reĝa filino, ŝi povus okupi en la imperiestra kortego lokon, egalan al tiuj okupataj de filinoj de plej eminentaj ro-

maj gentoj, tiom pli, ke la nacio, kies reganto estis ŝia patro, neniam ĝis nun militis kontraŭ Romo, kaj kvankam barbara, ĝi povus tamen, laŭ la atesto de Atelio Histro mem, montriĝi timinda, ĉar ĝi posedis «sennombran amason» da militistoj.

Urso cetere plene konfirmis tiun ateston, ĉar al demando de Vinicio pri la ligioj li respondis:

— Ni loĝas en arbaroj, sed nia lando estas tiel granda, ke neniu scias, kie finiĝas la arbarego, kaj la popolo estas tie multa. En la arbaroj estas ankaŭ lignaj urboj, kie regas granda bonstato, ĉar kion la semnonoj, markomanoj, vandaloj kaj kvadoj militrabas en la mondo, tion ni forprenas de ili. Sed ili ne kuraĝas militi kontraŭ ni, nur kiam vento blovas de ilia flanko, ili bruligas niajn arbarojn. Kaj ni timas nek ilin, nek la romian imperiestron.

— La dioj donis al Romo la regadon super la mondo, — diris Vinicio severe.

— La dioj estas malbonaj spiritoj, — respondis simple Urso, — kaj kie ne estas la romianoj, tie ankaŭ ne estas ilia regado.

Ĉe tio li bonigis la fajron kaj parolis kvazaŭ al si mem:

— Kiam la imperiestro prenis Kallinan en la kortegon kaj mi pensis, ke tie povas trafi ŝin malbono, mi volis iri for, en la arbarojn, kaj venigi la ligiojn helpe al la reĝid-

ino. Kaj la ligioj ekirus al Danubo, ĉar ili estas popolo bona, kvankam idolana. Jen! Mi portus al ili la «bonan novaĵon». Sed mi ja ĉiuokaze, kiam Kallina revenos al Pomponia, petos ŝin riverence, ke ŝi lasu min iri al ili, ĉar Kristo naskiĝis malproksime kaj ili eĉ ne aŭdis pri li ... Li sciis pli bone ol mi, kie li devis naskiĝi, sed se li venus en la mondon ĉe ni, en la arbaro, ni lin certe ne martirigus, sed ni vartus la infaneton kaj zorgus, ke manku al ĝi nek ĉasaĵoj, nek fungoj, nek kastoraj feloj, nek sukceso. Kaj kion ni militprenus de la svevoj kaj markomanoj, tion ni al ĝi redonus, ke ĝi havu bonstaton kaj komforton.

Tiel parolante, li almetis al la fajro vazon kun supo, destinita por Vinicio, kaj eksilentis. Lia penso vagis videble dum kelka tempo en la ligiaj arbaroj, kaj nur kiam la fluidaĵo komencis sibli, li verŝis ĝin en malprofundan pladon kaj, malvarmiginte ĝin sufiĉe, diris:

— Glaŭko konsilas, sinjoro, ke ci movu kiel eble malmulte eĉ tiun brakon, kiu estas sana, do Kallina ordonis, ke mi cin nutru.

Ligia ordonis! Kontraŭ tio estis nenia respondo. Vinicio eĉ ne pensis kontraŭstari al ŝia volo, kvazaŭ ŝi estus filino de imperiestro, aŭ diino, li ne respondis do eĉ unu vorton, kaj Urso, sidiĝinte apud lia lito, komencis ĉerpi la supon el la plado per malgranda trinkvazo kaj porti ĝin al



la buŝo de Vinicio. Li tion faris tiel zorgeme, kun tiel bona rideto en siaj bluaj okuloj, ke Vinicio ne kredis al siaj okuloj, ke tio povas esti la sama terura titano, kiu en la antaŭa tago, mortiginte Krotonon, atakis lin mem, kiel ventego, kaj disŝirus lin, se Ligia lin ne kompatus. La juna patricio unuafoje en la vivo konsideris, kio povas okazi en la animo de simplulo kaj barbaro.

Sed Urso montriĝis vartisto tiom mallerta, kiom zorgema. La trinkvazo tute malaperis inter liaj herkulaj fingroj, tiel ke por la buŝo de Vinicio restis neniom da loko. Post kelkaj malsukcesaj provoj la fortegulo, en grandega embaraso diris:

— He, pli facile estus eltreni uron el ĝia kaŝejo...

Vinicion ekamuzis la embarasiteco de la ligio, sed ne malpli ekinteresis lin lia rimarko. Li vidadis en cirkoj terurajn urojn, venigatajn el la nordaj arbaregoj — la plej bravaj *bestistoj*<sup>232</sup> kun timo luktis kontraŭ ili, kaj nur elefantoj superis ilin per grandeco kaj forto.

— Ĉu ci iam provis kapti tiajn bestegojn je la kornoj? — demandis li kun granda miro.

— Antaŭ ol pasis super mi dudek vintroj, mi timis, — respondis Urso, — sed poste tio okazadis!

Kaj denove li komencis nutri Vinicion, ankoraŭ pli

<sup>232</sup> Bestisto (lat. *bestiarius*) — gladiatoro luktanta kontraŭ sovaĝaj bestoj, aŭ servisto prizorganta ilin.

mallerte ol antaŭe.

— Mi devas peti Mirjamon aŭ Nazarion, — li diris.

Sed dume la pala kapeto de Ligia sin elŝovis de post la kurteno.

— Tuj mi helpos, — ŝi diris.

Kaj post momento ŝi eliris el la dormoĉambro, kie ŝi evidente estis sin preparanta al dormo, ĉar ŝi surhavis nur alfiguran tunikon, nomatan de la antikvuloj *capitium*, strikte kovrantan la bruston, kaj havis la harojn disligitaj. Vinicio, kies koro ekbatis pli vive ĉe ŝia vido, komencis ŝin riproĉi, ke ĝis nun ŝi ne pensis pri dormo, sed ŝi respondis gaje:

— Mi ĝuste intencis tion fari, sed antaŭe mi anstataŭos Urson.

Kaj preninte la trinkvazon, ŝi sidiĝis sur la rando de la lito kaj komencis nutri Vinicion, kiu sentis sin samtempe humiligita kaj feliĉa. Kiomfoje ŝi kliniĝis al li, radiis al li la varmo de ŝia korpo kaj ŝiaj disligitaj haroj faladis sur lian bruston; li paliĝadis pro la impreso, sed en la tumulto kaj ekscito de la pasioj li sentis ankaŭ, ke ŝi estas al li kara super ĉio kaj super ĉio adorata estaĵo, kompare kun kiu la tuta mondo estas nenio. Unue li avidis ŝin, nun li komencis plenbruste ŝin ami.

Antaŭe, kiel ĝenerale en la vivo, ankaŭ en siaj sentoj

li estis, kiel ĉiuj tiamaj homoj, blinda, senkonsidera egoisto, kiu zorgis nur pri si mem; nun li komencis zorgi ankaŭ pri ŝi.

Post momento li sekve rifuzis manĝi plu kaj, kvankam li trovis senliman volupton en ŝia vido kaj en ŝia ĉeesto, li diris:

— Sufiĉe. Iru dormi, mia dia.

— Ne nomu min tiel, — ŝi respondis, — ne decas al mi tion aŭskulti.

Tamen ŝi ridetis al li kaj poste diris, ke ŝia dormemopasis, ke ŝi ne sentas sin laca kaj ne iros kuŝiĝi, antaŭ ol Glaŭko alvenos. Li aŭskultis ŝiajn vortojn, kiel muzikon, kaj samtempe lia koro pleniĝadis per ĉiam pli granda emocio, ĉiam pli granda admiro, ĉiam pli granda dankemo, kaj la penso serĉis manieron por elmontri al ŝi tiun dankemon.

— Ligia, — li diris post momenta silento, — mi cin antaŭe ne konis. Sed nun mi scias, ke mi iris malĝustan vojon por cin akiri, do mi diras al ci: revenu al Pomponia Grecina kaj estu certa, ke de nun neniu levos kontraŭ cin la manon.

Sed ŝia vizaĝo subite malgajiĝis.

— Mi estus feliĉa, — ŝi respondis, — se mi povus ŝin ekvidi, almenaŭ de malproksime, sed reveni al ŝi mi ne

plu povas.

— Kial? — demandis Vinicio kun miro.

— Ni, kristanoj, scias pere de Akteo, kio okazos sur Palatino. Ĉu ci ne aŭdis, ke la imperiestro baldaŭ post mia forkuro, kaj antaŭ sia forveturo en Neapolon, alvokis Aŭlon kaj Pomponian — kaj supozante, ke ili min helpis, minacis ilin per sia kolero. Feliĉe, Aŭlo povis al li respondi: «Ci scias, sinjoro, ke neniam mensogo eliris el mia buŝo; mi ĵuras al ci, ke ni ne helpis ŝin forkuri kaj ke, same kiel ci, ni ne scias, kio al ŝi okazis!» La imperiestro ekkredis, poste li forgesis — kaj mi laŭ la konsilo de niaj superuloj, neniam skribis al la patrino, kie mi estas, por ke ŝi ĉiam povu purkonscience ĵuri, ke ŝi nenion scias pri mi. Ci tion eble ne komprenos, Vinicio, sed al ni ne estas permesite mensogi, eĉ por savi la vivon. Tia estas nia instruo, al kiu ni volas agordi la korojn, do mi ne vidis Pomponian de la tempo, kiam mi forlasis ŝian domon, kaj ŝin nur de tempo al tempo atingis malproksimaj eĥoj, ke mi vivas kaj estas sekura.

Ĉe tio ekposedis ŝin sopiro, ĉar roso da larmoj kovris ŝiajn okulojn, sed baldaŭ ŝi trankviliĝis kaj diris:

— Mi scias, ke ankaŭ Pomponia sopiras je mi, ni tamen havas niajn konsolojn, kiujn ne havas aliaj homoj.

— Jes, — rediris Vinicio, — via konsolo estas Kristo,

sed mi tion ne komprenas.

— Rigardu nin: por ni ne ekzistas disiĝoj, ne ekzistas doloroj kaj suferoj, kaj se ili venas, ili ŝanĝas sin en ĝojon. Eĉ la morto mem, kiu por vi estas la fino de la vivo, por ni estas nur ĝia komenco kaj ŝanĝo de feliĉo malpli bona je la pli bona, de la malpli trankvila je la pli trankvila kaj eterna. Konsideru, kia devas esti nia instruo, kiu ordonas al ni kompaton eĉ por niaj malamikoj, malpermesas mensogon, purigas niajn animojn de malbono kaj promesas senmezuran feliĉon postmorte.

— Mi aŭdis tion en Ostriano; mi vidis, kiel vi traktis min mem kaj Ĥilonon; kaj kiam mi pensas pri tio, ĝis nun ŝajnas al mi, ke ĝi estas songo kaj ke mi devas kredi nek miajn orelojn, nek la okulojn. Sed respondu al mia alia demando: ĉu ci estas feliĉa?

— Jes! — rediris Ligia. — Konfesante Kriston mi ne povas esti malfeliĉa.

Vinicio rigardis ŝin tiel, kvazaŭ tio, kion ŝi diris, estus tute ekster la mezuro de la homa rezonado.

— Kaj ci ne volus reveni al Pomponia?

— Mi volus per la tuta animo kaj mi revenos, se tia estos la volo de Dio.

— Do mi diras al ci: revenu, kaj mi ĵuras al ci je miaj laroj, ke mi ne levos kontraŭ cin la manon.

Ligia enpensigis momente, poste ŝi respondis:

— Ne. Mi ne povas endanĝerigi miajn familianojn. La imperiestro ne amas la genton de Plaŭcioj. Se mi revenus — ci scias, kiel per sklavoj diskoniĝas en Romo ĉiu novaĵo — ankaŭ mia reveno iĝus konata en la Urbo kaj Nerono sendube ekscius pri ĝi pere de siaj sklavoj. Tiam li punus Aŭlon, kaj en plej bona okazo denove forprenus min el lia domo.

— Jes, — diris Vinicio, kuntirante la brovojn, — tio povus okazi. Li farus ĝin, eĉ simple por montri, ke lia volo devas esti plenumita. Vere estas, ke li nur forgesis pri ci, aŭ ne volis pensi, opiniante ke ne li, sed mi estas ofendita. Eble tamen ... forpreninte cin de Aŭlo ... li cin redonus al mi, kaj mi revenigus cin al Pomponia.

Sed ŝi demandis malgaje:

— Vinicio, ĉu ci volus denove vidi min sur Palatino?

Li kunpremis la dentojn kaj respondis:

— Ne. Ci pravas. Mi parolis, kiel malsaĝulo! Ne!

Kaj subite li ekvidis antaŭ si kvazaŭ abismon sen fundo. Li estis patricio, li estis armea tribunuso, li estis potenca homo, sed super ĉiuj potencoj de la mondo, al kiu li apartenis, staris ja la frenezulo, kies volon aŭ malicon oni ne povis antaŭvidi. Ne konsideri lin, ne timi lin povis eble nur tiaj homoj kiel la kristanoj, por kiuj ĉi tiu tuta mondo,

ĝiaj disiĝoj, suferoj kaj la morto mem estis nenio. Ĉiuj aliaj devis tremi antaŭ li. La terureco de la tempo, en kiu ili vivis, sin montris al Vinicio en sia tuta monstra amplekso. Jen li ne povis redoni Ligian al Aŭlo pro la timo, ke la monstro rememoros pri ŝi kaj direktos al ŝi sian koleron; pro tiu sama kaŭzo, se li nun edzinigus al si Ligian, li povus endanĝerigi ŝin, sin mem kaj la Plaŭciojn. Unu momento de malbonhumoro sufiĉis por ĉiujn pereigi. Vinicio unuafoje en la vivo eksentis, ke aŭ la mondo devas ŝanĝiĝi kaj alinaskiĝi, aŭ la vivo iĝos tute neebla. Li ekkomprenis ankaŭ tion, kio ankoraŭ antaŭ momento estis por li malklara, ke en tia tempo nur la kristanoj solaj povis esti feliĉaj.

Sed antaŭ ĉio kaptis lin bedaŭro, ĉar li komprenis ankaŭ tion, ke li mem tiel implikis la vivon al si mem kaj al Ligia, kaj ke tiu implikaĵo estas preskaŭ senelira. Kaj influate de tiu bedaŭro li komencis paroli:

— Ĉu ci scias, ke ci estas pli feliĉa ol mi? En malriĉeco kaj en ĉi tiu unu ĉambro inter la simpluloj ci havis cian instruon kaj cian Kriston, dum mi havas nur cin, kaj kiam mi perdis cin, mi estis kiel mizerulo, kiu havas nek tegmenton super si, nek panon. Ci estas al mi pli kara ol la tuta mondo. Mi serĉis cin, ĉar sen ci mi ne povis vivi. Mi volis nek festenojn, nek dormon. Se mi ne esperus cin

retrovi, mi min ĵetus sur glavon. Sed mi timas la morton, ĉar mi ne povus cin rigardi. Mi diras al ci puran veron, ke mi ne kapablas vivi sen ci kaj ke ĝis nun mi vivis nur per la espero, ke mi cin retrovos kaj revidos. Ĉu ci memoras niajn interparolojn ĉe Aŭlo? Foje ci desegnis al mi fiŝon sur la sablo, sed mi ne komprenis, kion ĝi signifas. Ĉu ci memoras, kiel ni ludis pilkon? Alvenis Aŭlo, timigis nin per Libitino kaj interrompis al ni la interparolon. Pomponia diris ĉe la adiaŭo al Petronio, ke Dio estas unu, ĉiopova kaj kompatema, sed en niajn kapojn ne venis la ideo, ke via Dio estas Kristo. Li redonu cin al mi, kaj mi lin ekamos, kvankam li ŝajnas al mi dio de sklavoj, fremduloj kaj mizeruloj. Ci sidas apud mi kaj nur pri li ci pensas. Pensu ankaŭ pri mi, alie mi lin ekmalamos. Por mi ci sola estas diino. Benitaj estas ciaj patro kaj patrino, benita la lando, kiu cin naskis. Mi volus ĉirkaŭpreni ciajn piedojn kaj preĝi al ci, mi volus cin honori, al ci fari oferojn, antaŭ ci min adorklini — ci trioble dia!! Ci ne scias, ci ne povas scii, kiel mi cin amas...

Tiel parolante, li traŝovis la manojn sur sia paliĝinta frunto kaj duonfermis la okulojn. Lia naturo neniam konis barojn, nek en kolero, nek en amo. Li parolis kun emocio, kiel homo, kiu, ĉesinte sin regi, volas konsideri neniun mezuron en la vortoj, nek en la adoro. Sed li parolis el



la fundo de la animo kaj sincere. Oni povis senti, ke la doloro, admiro, pasio kaj adoro, amasiĝinte en lia brusto, ŝprucegis per neretenebla torento da vortoj.

Al Ligia liaj vortoj ŝajnis blasfemaj, tamen ŝia koro komencis bati, kvazaŭ ĝi volus disŝiri la tunikon, ĝenantan la bruston. Ŝi ne povis kontraŭstari kompaton por li kaj por lia turmento. Kortuŝis ŝin la adoro, kun kiu li parolis al ŝi. Ŝi sentis sin amata kaj adorata sen limo, ŝi sentis, ke ĉi tiu nefleksebla kaj danĝera homo nun apartenas al ŝi anime kaj korpe, kiel sklavo, kaj tiu sento de lia humileco, de sia potenco ŝin plenigis je feliĉo. La rememoroj reviviĝis en ŝi en unu momento. Denove li estis por ŝi tiu mirinda kaj belega, kiel idolana dio, Vinicio, kiu en la domo de Aŭlo parolis al ŝi pri amo kaj vekis, kvazaŭ el dormo, ŝian, tiam ankoraŭ duoninfanan, koron; tiu sama, kies kisojn ŝi ankoraŭ sentis sur sia buŝo, el kies brakoj Urso elŝiris ŝin sur Palatino, kvazaŭ li elŝirus ŝin el flamo. Sed nun, kun admiro kaj kune kun doloro sur sia agla vizaĝo, kun paliĝinta frunto kaj petega okulesprimo, vundita, venkita de la amo, ameganta, plena je adoro kaj humileco, li ekŝajnis al ŝi tia, kia tiam ŝi dezirus lin vidi kaj kian ŝi ekamus per la tuta animo, sekve pli kara ol iam ajn.

Subite ŝi ekkomprenis, ke povas veni momento, en kiu

lia amo ekregos kaj kaptos ŝin, kiel ventego, kaj eksentinte ĉi tion, ŝi mem spertis tiun impreson, kiun li spertis antaŭ momento: nome, ke ŝi staras ĉe la rando de abismo. Ĉu por tio ŝi forlasis la domon de Aŭlo? Por tio ŝi savis sin per forkuro? Por tio ŝi kaŝis sin tiel longe en la mizeraj kvartaloj de la urbo? Kio estas tiu Vinicio? Aŭgustano, soldato kaj kortegano de Nerono. Li partoprenis en ties malvirtoj kaj diboĉoj — kiel atestis tiu festeno, kiun Ligia ne povis forgesi, li ja kune kun aliaj vizitadis la templojn kaj oferdonadis al la malindaj dioj, je kiuj li eble eĉ ne kredis, sed al kiuj li tamen donadis oficialan honoron. Li ŝin persekutis por fari ŝin sia sklavino kaj amatino, kaj samtempe enpuŝi ŝin en tiun teruran mondon de luksoj, voluptoj, krimoj kaj malnoblaĵoj, vokantaj pri la Diaj kolero kaj venĝo. Li, vere, ŝajnis al ŝi ŝanĝiĝinta; sed ja li mem ĵus diris al ŝi, ke se ŝi pensos pri Kristo pli multe ol pri li, li pretas Kriston ekmalami. Al Ligia ŝajnis, ke la nura penso pri iu ajn alia amo ol la amo al Kristo, jam estas peko kontraŭ li kaj kontraŭ la instruo; kiam do ŝi rimarkis, ke en la fundo de ŝia animo povus vekiĝi aliaj sentoj kaj deziroj, ŝin kaptis timo pri ŝia estonteco kaj ŝia koro.

En tiu momento de ŝia interna batalo aperis Glaŭko, kiu venis prizorgi la malsanulon kaj esplori lian sanon. Sur la vizaĝo de Vinicio en unu sekundo bildiĝis kolero

kaj malpacienco. Li estis malkontenta, ke oni malhelpis lian interparolon kun Ligia, kaj kiam Glaŭko komencis fari al li demandojn, li respondadis preskaŭ kun malestimo. Baldaŭ li, vere, sin moderigis, sed se Ligia havis iajn iluziojn ke tio, kion li aŭdis en Ostriano, povus impresi lian neinflueblan naturon, tiuj ŝiaj iluzioj devis neniigĝi. Li ŝanĝigĝis nur por ŝi, sed ekster tiu sola sento restis en lia brusto la iama, severa kaj egoista, vere romana kaj kune lupa koro, nekapabla ne nur je kompreno de la dolĉa kristana instruo, sed eĉ je dankemo.

Ŝi foriris, fine, plena je interna zorgo kaj maltrankvilo. Iam en preĝoj ŝi oferadis al Kristo koron serenan kaj efektive puran, kiel larmo. Nun tiu sereneco malklariĝis. La internon de la floro penetris venena insekto kaj komencis tie zumi. Eĉ dormo, malgraŭ la du sendormaj noktoj, ne alportis al ŝi kvieton. Ŝi songĝis, ke en Ostriano Nerono, fronte de sekvantaro, formita el aŭgustanoj, bakĥantinoj, cibelpastroj kaj gladiatoroj, veturpremas per rozkronita ĉaro amasojn da kristanoj, kaj Vinicio ŝin kaptas en la brakojn, ŝin tiras sur sian kvadrigon kaj, premante ŝin al la brusto, flustras: «Venu kun ni!»

## Ĉapitro 27<sup>a</sup>

De tiu momento ŝi montriĝadis pli malofte en la komuna ĉambro kaj pli malofte proksimiĝadis al la lito de Vinicio. Sed ŝia trankvileco ne revenis. Ŝi vidis, ke Vinicio sekvas ŝin per petega rigardo, ke li atendas ĉiun ŝian vorton kiel favoron, ke li suferas kaj ne kuraĝas plendi por ne malplaĉi al ŝi, ke ŝi sola estas lia sano kaj ĝojo, kaj tiam ŝia koro ŝveladis pro kompatato. Baldaŭ ŝi ankaŭ rimarkis, ke ju pli ŝi penas lin eviti, des pli ŝi lin kompatas, kaj pro tio mem des pli kortuŝita ŝi iĝas. La trankvileco ŝin forlasis. Kelkfoje ŝi al si diradis, ke ŝia devo estas ĝuste restadi apud li — unue tial, ke la Dia instruo ordonas repagi per bono por malbono; kaj due, ĉar parolante kun li, ŝi povus inklini lin al ĉi tiu instruo. Sed samtempe la konscienco diradis al ŝi, ke ŝi trompas sin mem kaj ke ŝin logas al li nenio alia ol lia amo kaj lia ĉarmo. Tiel ŝi vivis en senĉesa anima malpaco, kiu grandiĝadis de tago al tago. Iaforte al ŝi ŝajnis, ke ŝin ĉirkaŭas ia reto, ke ŝi, volante ĝin traŝiri, ĉiam pli en ĝi implikiĝas. Ŝi ankaŭ devis konfesi al si, ke lia vido ĉiutage iĝas al ŝi pli bezona, lia voĉo pli aminda, kaj ke ŝi devas tutforte batali kontraŭ la deziro sidi apud lia lito. Kiam ŝi proksimiĝadis al li kaj li radiis de ĝojo, ankaŭ ŝian koron superverŝadis feliĉo. Iun tagon ŝi rimarkis

spurojn de larmoj sur liaj okulharoj, kaj, unuafoje en la vivo ŝi ekpensis, ke ŝi povus sekigi ilin per kisoj. Terurita de tiu penso kaj plena je malestimo por si mem, ŝi traploris la tutan sekvintan nokton.

Kaj li estis pacienca, kvazaŭ li ĵurus al si pacienci. Se iafoje liaj okuloj ekfajris per malpacienco, memvolo kaj kolero, tuj li retenadis tiujn brilojn, poste rigardis ŝin kun maltrankvilo, kvazaŭ volante peti de ŝi pardonon, kaj ŝin tio tuŝis ankoraŭ pli. Neniam ŝi havis la senton, ke ŝi estas tiel amata, kaj kiam ŝi pensis pri tio, ŝi sentis sin kune kulpa kaj feliĉa. Vinicio dume efektive aliĝadis. En liaj interparoloj kun Glaŭko estis malpli da fiereco. Ofte venadis al li la ideo, ke eĉ ĉi tiu malriĉa kuracisto-sklando kaj la alilandanino, la maljuna Mirjam', kiu ĉirkaŭigis lin per zorgemo, kaj Krispo, kiun li vidadis konstante dronanta en preĝoj, estas tamen homoj. Li miris similajn pensojn, tamen li havis ilin. Urson li ekamis post kelka tempo kaj nun parolis kun li tutajn tagojn, ĉar li povis paroli kun li pri Ligia; la grandegulo estis nelacigebla en la rakontado kaj, plenumante plej simplajn servojn ĉe la malsanulo, ankaŭ li komencis havi certan simpatian al Vinicio. Ligia ĉiam estis por Vinicio estaĵo kvazaŭ apartenanta al alia speco, centoble superanta tiujn, kiuj ŝin ĉirkaŭis; malgraŭ tio li komencis observi tiujn homojn, simplajn kaj malriĉ-

ajn, kion li faris neniam antaŭe en la vivo, kaj komencis malkovradi en ili diversajn atentindajn trajtojn, kies ekziston li neniam antaŭe supozis.

Nur Nazarion li ne povis toleri, ĉar ŝajnis al li, ke la juna knabo aŭdacas ami Ligian. Dum longa tempo li sin detenis, ne montrante al li malsimpaton, sed foje, kiam Nazario alportis al la knabino du koturnojn, kiujn li aĉetis en foirejo por sia propra perlaborita mono, en Vinicio vekigis la posteulo de la *kviritoj*, por kiu veninto el fremda nacio malpli signifis ol plej mizera vermo. Aŭdante dankojn de Ligia, li terure paliĝis kaj, kiam Nazario eliris por alporti akvon por la birdoj, li diris:

— Ligia, ĉu ci povas toleri, ke li faru al ci donacojn? Ĉu ci ne scias, ke la homojn el lia nacio la grekoj nomas judaj hundoj?

— Mi ne scias, kiel ilin nomas la grekoj, — ŝi respondis, — sed mi scias, ke Nazario estas kristano kaj mia frato.

Dirinte tion, ŝi rigardis lin kun miro kaj riproĉo, ĉar li jam dekutimigis sin de similaj eksplodoj, kaj li kunpremis la dentojn por ne diri al ŝi, ke tian ŝian fraton li ordonus mortvipi aŭ sendus lin en kamparon, por ke li, kiel *piedkatenito*,<sup>233</sup> fosu la teron en liaj siciliaj vinberejoj...

Tamen li sin ekregis, subpremite en si la koleron, kaj

<sup>233</sup> Latine *compeditus* — homo kun la piedoj katenitaj.

post momento diris:

— Pardonu min, Ligia. Ci estas por mi reĝa filino kaj krominfano de Plaŭcioj.

Kaj li tiagrade subigis sian naturon, ke kiam Nazario denove montriĝis en la ĉambro, li promesis al la knabo, ke post la reveno hejmen li donacos al li paron da pavoĵoj aŭ paron da fenikopteroj, da kiuj li havis plenajn ĝardenojn.

Ligia komprenis, kiom devas al li kosti tiaj venkoj kontraŭ si mem. Sed ju pli ofte li ilin atingadis, des pli ŝia koro emis al li. Lia merito rilate al Nazario estis tamen malpli granda ol ŝi supozis. Vinicio povis momente indigni kontraŭ li, sed li ne povis esti pro li ĵaluza. La filo de Mirjam' efektive ne multe pli signifis antaŭ liaj okuloj ol hundo, kaj krom tio li estis ankoraŭ infano, kiu, se li amis Ligian, amis ŝin kune sencie kaj sklave. Pli multe la juna tribunuso devis batali kontraŭ si mem por subiĝi, eĉ en silento, al tiu adoro, kiu meze de tiuj homoj ĉirkaŭis la nomon de Kristo kaj lian instruon. Tiurilate okazadis al Vinicio strangaj aferoj. Ĝi estis, malgraŭ ĉio, la instruo kredata de Ligia, do pro tiu nura kaŭzo li estus preta ĝin respekti. Krome, ju pli li resaniĝadis, des pli bone li rememoris la tutan vicon da okazoj, kiuj havis lokon de post tiu nokto en Ostriano, kaj la tutan vicon da ideoj, kiuj enfluadis de tiu tempo lian menson, des pli li miris pro la

superhoma forto de tiu instruo, kiu tiel funde alinaskadis la homajn animojn. Li komprenis, ke estas en ĝi io eksterordinara, io, kio ne ekzistis ĝis nun en la mondo, kaj li sentis, ke se ĝi ekposedus la tutan mondon, se ĝi inokulus al ĝi sian amon kaj sian kompatemon, tiam venus eble alia epoko, simila al tiu, kiam ankoraŭ ne Jovo, sed Saturno regis la mondon. Li ankaŭ ne kuraĝis dubi la supernaturan devenon de Kristo, nek lian leviĝon el mortintoj, nek aliajn miraklojn. La memvidintoj, kiuj pri tio parolis, estis tro kredindaj kaj tro abomenis mensogon, ke li povu supozi, ke ili rakontas aferojn neokazintajn. Fine la romana skeptikeco permesis ne kredi je la dioj, sed ĝi kredis je mirakloj.

Do, Vinicio staris antaŭ stranga enigmo, kiun li ne povis solvi.

Aliflanke tiu tuta instruo ŝajnis al li tiel kontraŭa al la ekzistanta ordo de la aferoj, tiel nerealigebla en la praktiko kaj tiel freneza, kiel neniu alia. Laŭ li la homoj, kaj en Romo, kaj en la tuta mondo, estis eble malbonaj, sed la ordo de la aferoj estis bona. Se, ekzemple, la imperiestro estus homo honesta, se la senato konsistus ne el malnob-laj diboĉuloj, sed el tiaj homoj, kia estis Trazeo, kion pli oni povus deziri? La Roma paco kaj la Roma estreco estis ja bonaj aferoj, la divido inter la homoj estis ja prava kaj



justa. Sed dume tiu instruo, laŭ la kompreno de Vinicio, devus detrui ĉian ordon, ĉian estrecon, kaj neniigi ĉiajn diferencojn. Kaj kio tiam okazus, ekzemple, pri la Roma estreco kaj regno? Ĉu la romanoj povas ĉesi regi, aŭ agnoski la tutan brutaron da venkitaj nacioj kiel egalajn al si? Por tio ĉi jam ne estis loko en la kapo de la patricio.

Krome, por li persone, tiu instruo estis kontraŭa al ĉiuj liaj ideoj, kutimoj, karaktero kaj konceptoj pri la vivo. Li tute ne povis imagi, kiel li povus ekzisti, se li, ekzemple, ĝin akceptus. Li timis ĝin kaj admiris ĝin, sed lia naturo mem protestis kontraŭ la akcepto. Li komprenis fine, ke nenio alia ol ĝi lin disigis de Ligia, kaj kiam li pensis pri tio, li ĝin malamegis per ĉiuj fortoj de sia animo.

Tamen li jam konsciis, ke ĝuste tiu instruo ornamis Ligian per tiu iel escepta, neesprimebla beleco, kiu en lia koro naskis krom la amo kulton, krom la voluptodeziro adoron, kaj el Ligia mem faris estaĵon karan al li super ĉio en la mondo. Tiam denove li volus ami Kriston. Kaj li komprenis klare, ke aŭ li devas lin ekami, aŭ ekmalami, sed resti indiferenta li ne povas. Dume lin puŝis kvazaŭ du kontraŭaj ondaroj, li hezitis en la pensoj, li hezitis en la sentoj ne povante elekti; sed li klinadis la kapon kaj donadis silentan honoron al tiu por li nekomprenebla dio,

nur tial, ke tiu estis la dio de Ligia.

Kaj Ligia vidis, kio en li okazas, kiel li batalas kontraŭ si mem, kiel lia naturo malakceptas tiun instruon, kaj dum unuflanke tio ŝin senlime ĉagrenis, aliparte tamen bedaŭro, kompato kaj dankemo por tiu silenta respekto, kiun li elmontradis al Kristo, puŝis al li ŝian koron kun nerezistebla forto. Ŝi rememoradis Pomponian Grecinan kaj Aŭlon. Por Pomponia la penso, ke trans la tombo ŝi ne retrovos Aŭlon, estis la fonto de senĉesa malĝojo kaj de neniam sekiĝantaj larmoj. Ligia komencis nun pli bone kompreni tiujn maldolĉajn sentojn kaj tiun doloron. Ankaŭ ŝi trovis karan homon, kaj ankaŭ ŝin minacis eterna foresto de li. Iafoje ŝi faris al si iluziojn, ke lia animo malfermiĝos ankoraŭ al la veroj de Kristo, sed tiuj iluzioj ne povis daŭri. Vinicio estkiel kristano?! Eĉ en ŝia nesperta kapo tiuj du ideoj ne povis kuniĝi. Se la prudenta, solida Aŭlo ne iĝis kristano sub la influo de la saĝa kaj perfekta Pomponia, kiel povus iĝi Vinicio? Al tio ne estis respondo, aŭ estis, pli ĝuste, nur unu: ke ekzistas por li nek espero, nek savo.

Sed Ligia rimarkis kun teruro, ke tiu kondamna verdikto, kiu pendas super li, anstataŭ ŝin de li malinklini, pro la nura kompato lin faras al ŝi ankoraŭ pli kara. Iafoje ŝin kaptis la deziro sincere paroli kun li pri lia malluma

estonteco, sed kiam, iun tagon, sidiĝinte apude, ŝi diris al li, ke ekster la kristana instruo ekzistas nenia vivo, li, estante jam pli forta, sin duonlevis per sia sana brako kaj subite metis la kapon sur ŝiajn genuojn, dirante:

— *Ci estas mia vivo!*

Tiam la spiro morthaltis en ŝia brusto, ŝin forlasis la konscio, volupta tremo ŝin trakuris de la piedoj ĝis la kapo. Kaptinte per la manoj liajn tempiojn, ŝi penis lin levi, sed ĉe tio ŝi kliniĝis al li tiel, ke ŝiaj lipoj tuŝis liajn harojn; kaj kelkmomente ili baraktis en ekstazo kontraŭ si mem kaj kontraŭ la amo puŝanta ilin unu al la alia.

Ligia leviĝis fine kaj forkuris, sentante flamon en la vejnoj kaj kapturmon. Sed tio estis la guto, kiu troplenigis la jam plenegan pokalon. Vinicio ne divenis, kiel kare li devos pagi la feliĉan momenton; sed Ligia ekkomprenis, ke nun ŝi mem bezonas helpon. La nokton post tiu vespero ŝi pasigis sendorme, en larmoj kaj en preĝoj, kun la sento, ke ŝi ne estas inda preĝi kaj esti elaŭskultita. La sekvintan matenon ŝi eliris frue el la dormoĉambro, kaj vokinte Krispon en ĝardenan laŭbeton, kovritan je hederoj kaj velkintaj konvolvuloj, ŝi malkaŝis al li sian tutan animon, petegante kune, ke li permesu al ŝi forlasi la domon de Mirjam', ĉar ŝi ne fidus plu al si kaj ne povas venki en la koro la amon al Vinicio.

Krispo, kiu estis homo maljuna, severa kaj dronanta en senĉesa ekstazo, konsentis la projekton pri la forlaso de la domo de Mirjam'; tamen li ne trovis vortojn de pardono por tiu peka, laŭ lia koncepto, amo. Lia koro ŝvelis de indigno pro la nura penso, ke tiu Ligia, pri kiu li zorgis de la momento de ŝia forkuro, kiun li ekamis, plifirmigis en la kredo kaj kiun ĝis nun li rigardis, kiel blankan lilion, kreskintan sur la grundo de la kristana instruo kaj makulitan per nenia tera spiro, povis trovi en la animo lokon por alia amo ol la ĉiela. Li kredis ĝis nun, ke nenie en la tuta mondo pli pura koro batas por la gloro de Kristo, kaj esperis al li ŝin oferi — kiel perlon, kiel juvelon kaj valoran kreaĵon de siaj manoj; tial la neatendita senreviĝo lin plenigis je miro kaj amarsento.

— Iru kaj petegu Dion, ke li pardonu al ci ciajn kulpojn, — li diris al ŝi malserene. — Forkuru, antaŭ ol la malbona spirito, kiu cin implikis, klinos cin al kompleta falo kaj antaŭ ol ci malkonfesos la Savinton. Dio mortis por ci sur la kruco, por per sia sango elaĉeti cian animon, sed ci preferis ekami tiun, kiu volis cin fari sia konkubino. Dio mirakle cin savis el liaj manoj, sed ci malfermis la koron al la malĉasta voluptodeziro kaj ekamis la filon de malumo. Kio li estas? Amiko kaj servanto de Antikristo, kunulo de liaj diboĉoj kaj krimoj. Kien li cin kondukos, se

ne en tiun abismon kaj en tiun Sodomon, kie li mem vivas, kaj kiun Dio detruos per la flamo de sia kolero? Sed mi diras al ci: prefere ci mortu, prefere la muroj de ĉi tiu domo falu sur cian kapon antaŭ ol tiu viro enrampos cian bruston kaj ĝin salivos per la veneno de sia malnobleco.

Kaj li ekscitiĝadis ĉiam pli, ĉar la kulpo de Ligia inspiris al li ne nur koleron, sed ankaŭ abomenon kaj malestimom por la homa naturo ĝenerale, kaj speciale por la virina, kiun eĉ la kristana instruo ne ŝirmis kontraŭ la malfirmeco de Evo. Ne gravis por li, ke la knabino restis ĉasta, ke ŝi volis forkuri de tiu amo kaj ke ŝi konfesis ĝin kun bedaŭro kaj pento. Krispo volis ŝin ŝanĝi en anĝelon kaj levi en altsferojn, kie ekzistis nur amo al Kristo, kaj jen ŝi ekamis aŭgustanon! La nura penso pri tio plenigis lian koron per teruro, kiun plifortigis la sento de espartrompo kaj seniluziigo. Ne! Tion li ne povis al ŝi pardoni! Vortoj de indigno bruligis liajn lipojn, kvazaŭ ardantaj karboj; li ankoraŭ batalis kontraŭ si mem por ilin ne elparoli, sed li skuis siajn maldikajn manojn super la terurita knabino. Ligia sentis sin kulpa, sed ne tiagrade. Ŝi kredis eĉ, ke la foriĝo el la domo de Mirjam' estos ŝia venko kontraŭ la tento kaj moderigos ŝian kulpon. Krispo polvigis ŝin; li montris al ŝi la tutan vantecon kaj malnoblecon de ŝia animo, kiun ŝi ĝis nun neniam en si suspektis. Ŝi

kredis eĉ, ke la maljuna presbitero, kiu de la momento de ŝia forkuro estis por ŝi kvazaŭ patro, elmontros al ŝi iom da kompatato, ŝin konsolos, kuraĝigos kaj plifirmigos.

— Al Dio mi oferas mian senreviĝon kaj mian doloron, — li parolis, — sed ci malfideliĝis al la Savinto, ĉar ci flankeniris kvazaŭ sur marĉon, kies vaporoj venenis cian animon. Ci povis oferi ĝin al Kristo, kiel multekostan vazon, kaj diri al li: «Sinjoro, plenigu ĝin per favoro!» Sed ci preferis oferi ĝin al servanto de la malbona spirito. Dio al ci pardonu kaj cin kompatu; ĉar mi, ĝis ci forĵetos la serpenton... mi, kiu cin opiniis elektita...

Kaj subite li ĉesis paroli, ĉar li rimarkis, ke ili ne estis solaj.

Tra la velkintaj konvolvuloj kaj tra la hederoj, egale verdaj somere kaj vintre, li ekvidis du homojn, el kiuj unu estis la apostolo Petro. La alian li ne povis komence rekonni, ĉar mantelo el dika harteksaĵo, nomata *cilicium*,<sup>234</sup> kovris parton de lia vizaĝo. Dum momento ŝajnis al Kristo, ke tio estis Ĥilono.

Ili dume, ekaŭdinte la levitan voĉon de Kristo, eniris la laŭbeton kaj sidiĝis sur ŝtonan benkon. Tie la kunulo

<sup>234</sup> *cilicium* (lat.) — teksaĵo el kapraj aŭ kamelaj haroj, kiu estis uzata por fari sakojn kaj pentovestojn; Bible nomata *sakaĵo* (ekz-e *Jona* 3:6). Tiucele oni bredis kaprojn en Kilikio (gr. Κιλικία → lat. *Cilicia*), de kie la latina nomo.

de Petro malkovris vizaĝon malgrasan, kun senhariĝanta kranio, kovritan flanke de krispaj haroj, kun ruĝetaj palpebroj kaj kurba nazo — malbelan kaj kune inspiritan vizaĝon, en kiu Krispo rekonis la trajtojn de Paŭlo el Tarso.

Sed Ligia, sin ĵetinte sur la genuojn, ĉirkaŭbrakis kvazaŭ en malespero la piedojn de Petro kaj, preminte sian afliktitan vizaĝon al la faldoj de lia mantelo, restis tiel en silento.

Kaj Petro diris:

— Pacon al viaj animoj.

Poste, vidante la infanon ĉe siaj piedoj, li demandis, kio okazis. Tiam Krispo komencis rakonti ĉion, kion Ligia al li konfesis: ŝian pekan amon, ŝian deziron forkuri el la domo de Mirjam'; kaj sian bedaŭron, ke la animo, kiun oferi al Kristo li volis pura, kiel larmo, makuliĝis per mondana sento al kunulo de ĉiaj krimoj en kiuj dronis la idolana mondo kaj kiuj vokis pri venĝo de Dio.

Ligia dum lia rakontado ĉirkaŭprenadis ĉiam pli forte la piedojn de la apostolo, kvazaŭ volante ĉe ili serĉi defendon kaj elpetegi almenaŭ iomete da kompatato.

La apostolo, aŭskultinte ĝis la fino, sin klinis kaj metis sian kadukan manon sur ŝian kapon, poste li levis la okulojn al la maljuna pastro kaj diris:

— Krispo, ĉu ci ne aŭdis, ke nia amata Majstro ĉeestis

la edziĝofeston en Kano kaj benis la amon inter la viro kaj la virino?

La manoj de Krispo falis kaj li rigardis kun mirego la parolanton, ne povante eldiri eĉ vorton.

Kaj tiu, post momenta silento, plu demandis:

— Krispo, ĉu ci supozas, ke Kristo, kiu permesis al Maria el Magdalo kuŝi ĉe siaj piedoj<sup>235</sup> kaj kiu pardonis al la adultulino, sin fortunus de ĉi tiu infano, pura, kiel lar-  
mo?

Ligia, plorĝemante, ankoraŭ pli forte sin alpremis al la piedoj de Petro, kompreninte, ke ne vane ŝi serĉis tie defendon. La apostolo, levinte ŝian vizaĝon, surverŝitan de larmoj, parolis al ŝi:

— Kiel longe la okuloj de tiu, kiun ci amas, ne malfermos sin al la lumo de la vero, tiel longe lin evitu, ke li ne alkonduku cin al peko; sed preĝu por li kaj sciuj, ke nenia kulpo estas en cia amo. Kaj ĉar ci volas defendi cin de la tento, tiu ĉi merito estos al ci kalkulita. Ne ĉagreniĝu kaj ne ploru, ĉar mi diras al ci, ke la favoro de la Savinto ne forlasis cin, ke ciaj preĝoj estos elaŭskultitaj, kaj post la malĝojoj komenciĝos tagoj de feliĉo.

Dirinte ĉi tion, li metis ambaŭ manojn sur ŝiajn harojn kaj levinte la okulojn supren, benis ŝin. El lia vizaĝo

<sup>235</sup> La romkatolika tradicio identigas Marian el Magdalo la mirhoportantinon (Mar. 16:9, Joh. 20) kun la pentanta pekulino (Luko 7).



radiis supertera boneco.

Sed la pentigita Krispo komencis sin humile pravigi:

— Mi pekis kontraŭ la kompatemo, — li diris, — sed mi pensis ke, allasante la teran amon al la koro, ŝi malkonfesis Kriston...

Petro respondis:

— Trifoje mi lin malkonfesis, tamen li min pardonis kaj ordonis paŝti liajn ŝafojn.

— ... Kaj tial, — finis Krispo, — ke Vinicio estas aŭgustano...

— Kristo moligadis korojn ankoraŭ pli malmolajn, — respondis Petro.

Ĉe tio Paŭlo el Tarso, kiu ĝis nun silentis, almetis la fingrojn al sia brusto kaj, montrante sin mem, diris:

— Jen mi estas tiu, kiu persekutadis kaj ekzekutigadis la servantojn de Kristo. Dum la ŝtonumo de Stefano mi gardis la vestojn de tiuj, kiuj lin ŝtonumis; mi volis elradi-kigi la Veron el la tuta priloĝata tero — kaj tamen ĝuste min la Sinjoro destinis, ke mi ĝin portu en ĉiujn landojn. Kaj mi ĝin predikis en Judeo, en Grekujo, sur la insuloj kaj en ĉi tiu malpia urbo, kiam mi loĝis ĉi tie unuafoje kiel malliberigito. Kaj nun, kiam min alvokis Petro, mia estro, mi enpaŝos ĉi tiun domon, por klini tiun fieran kapon al la piedoj de Kristo kaj ĵeti semon en tiun ŝtonplenan

grundon, kiun la Sinjoro fruktodonigos, por ke ĝi nasku riĉan rikolton.

Li leviĝis — kaj tiam al Krispo ĉi tiu malgranda, kurbadorsa homo ekŝajnis tio, kio li efektive estis: giganto ekskuonta la fundamentojn de la tero kaj ekposedonta la popolojn kaj la landojn.

## Ĉapitro 28<sup>a</sup>

Petronio al Vinicio:

*«Kompatu min, mia kara, imitu en ciaj leteroj nek la lacedemonianojn, nek Julion Cezaron. Se ci almenaŭ povus, kiel li, skribi: veni, vidi, vici!<sup>236</sup> — mi aprobus tiam la lakonecon. Sed cia letero signifas finfine: veni, vidi, fugi;<sup>237</sup> kaj ĉar tia solvo de la afero estas tute kontraŭa al cia naturo, ĉar ci estis vundita kaj ĉar fine trafis cin eksterordinaraj okazoj, tial cia letero bezonas klarigojn. Mi ne kredis al la okuloj, kiam mi tralegis, ke tiu ligio sufokis Krotonon tiel facile, kiel kaledonia hundo sufokas lupon en la intermontoj de Hibernio<sup>238</sup>. Tiu homo valoras tiom da oro, kiom li mem pezas, kaj*

<sup>236</sup> *Veni, vidi, vici* (lat.) — mi alvenis, rigardis, venkis (la fama raporto de Cezaro al la Senato pri lia rapida venko kontraŭ *Farnaces*, reĝo de Ponto).

<sup>237</sup> *Veni, vidi, fugi* (lat.) — mi alvenis, ekrigardis, forkuris.

<sup>238</sup> **Kaledonio** [PIV] — antikva nomo de Skotlando. **Hibernio** [PIV] — latina nomo de Irlando.

nur de li mem dependus, ke li iĝu favorato de la imperiestro. Kiam mi revenos en la Urbon, mi devos konatiĝi kun li pli proksime kaj mi gisigos laŭ li statuon el bronzo. La Kuprobarba krevos de scivolo, kiam mi diros al li, ke ĝi estas laŭ vivmodelo. Vere atletaj korpoj estas ĉiam pli maloftaj en Italujo kaj en Grekujo; pri Oriento ni eĉ ne parolu, kaj la ĝermanoj, kvankam bonkreskaj, havas muskolojn kovritajn de graso kaj pli grandan volumenon ol forton. Sciiĝu de la ligio, ĉu li estas escepto, aŭ ĉu en lia lando estas pli multaj homoj al li similaj. Eble ci aŭ mi devos iam laŭofice aranĝi cirkludojn; utile estus scii, kie serĉi la plej bonajn korpojn. Sed gloro estu al la dioj orientaj kaj okcidentaj, ke ci eliris viva el similaj manoj. Oni ŝparis cin certial, ĉar ci estas patricio kaj filo de konsulo, sed ĉio, kio cin trafis, inspiras al mi plej grandan miron: do tiu tombejo, kie ci troviĝis meze de la kristanoj, kaj ili mem, kaj ilia konduto rilate al ci; kaj la posta forkuro de Ligia, kaj fine tiu nedifinebla malĝojo kaj maltrankvilo, kiun spiras cia letero. Klarigu al mi la aferon, ĉar multon mi ne komprenas, kaj se ci volas de mi veron, mi diros malkaŝe, ke mi komprenas nek la kristanojn, nek cin, nek Ligian. Kaj ne miru, ke mi, kiun ekster mia propra persono malmultaj aferoj interesas en la mondo, demandas pri ĉio tiel scivole. Mi partoprenis ĉion okazintan, do ĝi estas iom mia afero. Skribu rapi-

*de, ĉar mi ne povas antaŭdiri, kiam ni revidiĝos. En la kapo de la Kuprobarba la projektoj varias, kiel printempaj ventoj. Nun, sidante en Benevento, li deziras veturi rekte en Grekujon kaj ne reveni en Romon. Tigeleno konsilas al li tamen, ke li revenu almenaŭ por kelka tempo, ĉar la popolo, sopiranta lian personon (legu: cirkludojn kaj panon), povus ekscitiĝi. Mi do ne scias, kiel okazos. Se Aĥajo superos, eble ni ekvolos iri Egiptujon. Mi insistus plej forte, ke ci venu ĉi tien, ĉar mi opinias, ke en tia animstato la vojaĝo kaj niaj distraĵoj estus por ci kuracilo, sed ci povus nin jam ne trafi. Pripensu tamen, ĉu en tia okazo ci eble preferus ripozi en ci-aj siciliaj posedaĵoj ol restadi en Romo. Adiaŭ — kaj skribu al mi vaste pri ci mem. Mi esprimas ĉi-foje neniajn dezirojn, krom tiujn pri la sano, ĉar je Polukso, mi ne scias, kion al ci deziri.»*

Vinicio, ricevinte ĉi tiun leteron, havis komence neni-an emon respondi. Iel li sentis, ke respondi ne penvaloras, ke tio al neniu utilos, nenion klarigos kaj nenion solvos. Lin ekregis indiferenteco kaj sento pri vanteco de la vivo. Ŝajnis al li ankaŭ, ke Petronio neniukaze lin komprenos kaj ke okazis io tia, kio ilin malproksimigis unu de la alia. Sed ankaŭ kun si mem li ne povis sin akordigi.

Reveninte el Transtibero en sian luksan palaceton en Karinoj, li ankoraŭ estis malforta, elĉerpita, kaj dum la

unuaj tagoj ĝuis la ripozon, komforton kaj bonstaton, kiuj lin ĉirkaŭis. Sed tiu ĝuo daŭris mallonge. Baldaŭ li eksentis, ke li vivas en malpleno, ke ĉio, kio ĝis nun prezentis por li la intereson de la vivo, aŭ ne plu ekzistas por li, aŭ malgrandiĝis ĝis apenaŭ rimarkeblaj dimensioj. Li havis tian senton, kvazaŭ oni subtranĉis en lia animo la kordojn kiuj ĝis nun lin ligis kun la vivo, kaj streĉis neniujn anstataŭajn. Ĉe la penso, ke li povus veturi Beneventon, poste Aĥajon, kaj profundiĝi en la vivon de voluptoj kaj frenezaj ekscesaĵoj, li spertis senton de vanteco. «Por kio? Kion mi profitos el tio?» Jen estis la unuaj demandoj, kiuj trairis lian kapon. Kaj unuafoje en la vivo li ekpensis, ke se li veturus, tiam la parolmaniero de Petronio, lia sprito, lia sagaco, lia eleganta difinado de pensoj kaj trovado de ĝustaj vortoj por ĉiu ideo, povus lin nun enuigi.

Tamen ankaŭ soleco komencis lin enuigi. Ĉiuj liaj konatoj estis kun la imperiestro en Benevento, do li devis sidi hejme sola, kun kapo plena je pensoj kaj kun koro plena je nebulsentoj, kiujn li ne sciis al si klare prezenti. Li havis tamen iafoje momentojn, en kiuj li opiniis, ke se li povus iom paroli kun iu pri ĉio, kio en li okazas, eble li kapablus ĉion tion koncepti, ordigi kaj pli bone esplori. Sub la influo de tiu espero, post kelkaj tagoj da hezitado li decidis tamen respondi al Petronio, kaj kvankam li ne est-

is ankoraŭ certa, ĉu li sendos al li tiun respondon, li skribis ĝin tamen en la sekvantaj vortoj:

«Ci volas, ke mi skribu pli vaste; mi konsentas. Ĉu mi kapablos fari tion pli klare, mi ne scias, ĉar mi eĉ mem ne scipovas malligi multajn nodojn. Mi informis cin pri mia restado inter la kristanoj, pri iliaj agoj kun la malamikoj, inter kiuj ili rajtis kalkuli ankaŭ min kaj Ĥilonon, fine pri la boneco, kun kiu mi estis flegata, kaj pri la malapero de Ligia. Ne, mia kara: ne tial oni min ŝparis, ke mi estas filo de konsulo. Tiaj konsideroj por ili ne ekzistas, ĉar ili ja pardonis ankaŭ al Ĥilono, kvankam mi mem ilin inklinigis, ke ili lin enterigu en la ĝardeno. Tio estas homoj, kiajn la mondo ĝis nun ne vidis, kaj instruo, pri kia la mondo ne aŭdis. Nenion plian mi povas al ci diri, krom ke maltrafos ĉiu kiu provos mezuri ilin per nia mezurilo. Mi diros al ci anstataŭe, ke se mi kuŝus kun rompita brako en mia domo kaj se min flegus miaj servistoj, aŭ eĉ miaj familianoj, mi havus sendube pli grandan komforton, sed mi ne spertus eĉ duone tian zorgemon, kian mi spertis inter ili. Sciu ankaŭ tion, ke Ligia estas sama kiel la aliaj. Se ŝi estus mia fratino aŭ mia edzino, ŝi ne povus flegi min pli zorgeme. Ofte ĝojo superverŝadis mian koron, ĉar mi kredis, ke nur amo povas inspiri similan zorgemon. Ofte mi legis ĝin en ŝia vi-

zaĝo kaj rigardo, kaj tiam — ĉu ci kredos? — inter tiuj simpluloj, en la malriĉa ĉambro, kiu servis al ili kune kiel kuirejo kaj triklinio, mi sentis min pli feliĉa ol iam ajn. Ne! Mi ne estis al ŝi indiferenta, kaj eĉ hodiaŭ alia penso ŝajnas al mi nekredebla. Tamen tiu sama Ligia forlasis, sekrete antaŭ mi, la loĝejon de Mirjam'. Mi sidadas nun dum tutaj tagoj kun kapo apogita sur la manoj, kaj pensas, kial ŝi tion faris? Ĉu mi skribis al ci, ke mi mem al ŝi proponis revenigi ŝin al Aŭlo? Ŝi respondis al mi, vere, ke tio jam estas neebla — kaj tial, ke ili forveturis en Sicilion, kaj pro la famoj, kiuj, transportate de la sklavoj el domo en domon, atingas Palatinon. Nerono povus denove ŝin forpreni de Aŭlo. Vere! Ŝi tamen sciis, ke mi ne plu ŝin atencos, ke mi forlasis la vojon de perforto, kaj povante nek ĉesi ŝin ami, nek vivi sen ŝi, mi enkondukus ŝin en mian domon tra florkronita pordo kaj sidigus sur sanktigitan felon apud la hejmfajro ... Tamen ŝi forkuris! Kial? Nenio ŝin minacis plu. Se ŝi min ne amis, ŝi povis min malakcepti.

Tagon antaŭe mi ekkonis strangan homon, iun Paŭlon el Tarso, kiu parolis kun mi pri Kristo kaj pri lia instruo tiel potence, ke ŝajnis al mi, kvazaŭ ĉiu lia vorto ŝanĝas en rubojn ĉiujn fundamentojn de nia mondo. Tiu sama homo vizitis min post ŝia forkuro kaj diris al mi: „Kiam Dio malfermos ciajn okulojn al la lumo kaj forigos de ili la vualon, kiel

de la miaj, ci eksentos, ke ŝi prave agis, kaj tiam ci eble ŝin retrovos“. Kaj nun mi streĉas la kapon pro tiuj vortoj, kvazaŭ mi aŭdus ilin el la buŝo de Pitio en Delfo. Iafoje ŝajnas al mi, ke mi jam iom komprenas. Ili, amante la homojn, estas malamikoj de nia vivo, de niaj dioj kaj de niaj krimoj; do ŝi forkuris de mi, kiel de homo, kiu apartenas al tiu mondo kaj kun kiu ŝi devus partopreni la vivon, konsideratan de la kristanoj kiel malvirta.

Ci diros, ke se ŝi povis min malakcepti, ŝi ne bezonis foriĝi. Se tamen ankaŭ ŝi min amas? En tiu okazo ŝi volis forkuri de la amo. Ĉe la nura penso pri tio mi sentas la deziron dissendi la sklavojn en ĉiujn stratetojn de Romo kaj ordoni al ili voki en la domoj: „revenu, Ligia!“ Sed mi ĉesas kompreni, kial ŝi tion faris. Mi ja ne malpermesus al ŝi kredi je Kristo kaj mem mi konstruus al li altaron en la atrio. Kiel povus ĝeni min unu nova Dio pli kaj kial mi ne ekkredu je li, mi, kiu ne tre kredas je la malnovaj? Mi scias tute certe, ke la kristanoj neniam mensogas, kaj ili diras, ke li leviĝis el mortintoj. Homo ja ne povis tion fari.

Tiu Paŭlo el Tarso, kiu estas roma civitano, sed kiu, kiel judo, konas la malnovajn hebreaajn librojn, diris al mi, ke la veno de Kristo estis antaŭdirata de la profetoj antaŭ miloj da jaroj. Ĉio tio estas eksterordinaraj aferoj, sed ĉu eksterordinareco ne ĉirkaŭas nin de ĉiuj flankoj? Oni ja ne ĉesis an-



*koraŭ paroli pri Apolonio el Tiano. Tio, kion konfirmis Paŭlo, ke ne ekzistas tuta aro da dioj, sed ekzistas unu, ŝajnas al mi prudenta. Onidire la samon opinias ankaŭ Seneko, kaj antaŭ li, multaj aliaj. Kristo vivis, lasis sin krucumi por savi la mondon, kaj leviĝis el mortintoj. Ĉio ĉi tio estas tute certa, mi do ne vidas kaŭzon, kial mi obstinu ĉe la kontraŭa opinio aŭ kial mi ne konstruu al li altaron, se mi estas preta konstrui ĝin, ekzemple, al Serapo. Ne estus al mi malfacile rezigni la aliajn diojn, ĉar neniu ja, havanta iom da saĝo en la kapo, kredas je ili.*

*Sed ŝajnas al mi, ke ĉio ĉi tio ankoraŭ ne kontentigas la kristanojn. Ne sufiĉas adori Kriston, oni devas ankoraŭ vivi laŭ lia instruo. Kaj jen mi ekstaras kvazaŭ ĉe la bordo de maro, kiun oni ordonas al mi piede travadi. Se mi tion al ili promesus, ili mem sentus, ke en mia buŝo tio estas vanaj vortoj. Paŭlo malkaŝe diris al mi tion.*

*Ci scias, kiel mi amas Ligian, kaj ci scias, ke ekzistas nenio, kion mi ne farus por ŝi. Sed mi ja ne povus, eĉ je ŝia postulo, levi sur la ŝultrojn Sorakton aŭ Vezuvion, nek enteni en miaj manoj la Trazimenan lagon<sup>239</sup>, nek ŝanĝi miajn okulojn el nigraj en bluajn, kiajn havas la ligioj. Se ŝi postulus, mi volus, sed tio estus ekster mia povo. Mi ne estas*

<sup>239</sup> Lat. *Trasumennus/Trasimennus lacus*, it. *Lago Trasimeno* — granda (15 km longa) lago je 150 km norden de Romo.

filozofo, sed mi ankaŭ ne estas tiel malsprita, kiel mi eble kelkfoje ŝajnis al ci. Kaj mi diros al ci jene: mi ne scias, kion la kristanoj faras por vivi, mi scias aliflanke, ke kie komenciĝas ilia instruo, tie finiĝas la Roma regado, finiĝas Romo, finiĝas la vivo, la diferenco inter venkito kaj venkinto, inter riĉulo kaj malriĉulo, inter mastro kaj sklavo, finiĝas la ofica digno, finiĝas la imperiestro, la leĝoj kaj la tuta ordo de la mondo; anstataŭ ĉio ĉi tio venas Kristo kaj kompatemo, kia ĝis nun neniam ekzistis; boneco, kontraŭa al la homaj kaj al niaj instinktoj. Al mi, vere, Ligia gravas pli multe ol la tuta Romo kaj ĝia regado, kaj pereu eĉ la mondo, ke mi nur povu havi ŝin en mia hejmo. Sed tio estas alia afero. Por ili, por la kristanoj, oni devas, krome, senti, ke tiel estas bone kaj havi en la animo nenion alian. Kaj mi — la dioj estu miaj atestantoj! — mi ne povas. Ĉu ci komprenas, kion tio signifas? Estas en mia naturo io, kio forpuŝas tiun instruon, kaj eĉ se mia buŝo ĝin glorus, eĉ se mi sekvadus ĝiajn regulojn, la saĝo kaj la animo diras al mi, ke mi tion faras por la amo por Ligia, kaj ke sen Ligia nenio en la mondo estus al mi pli kontraŭa. Kaj stranga afero, ke tia homo, kiel Paŭlo el Tarso, komprenas tion, kaj ke komprenas ankaŭ, malgraŭ sia simpleco, tiu maljuna teurgo,<sup>240</sup> la

<sup>240</sup> Lat. *theurgus* [t'ĕ'urgus] ← gr. θεουργός — sorĉisto, vidiganta diojn kaj fantomojn.

plej granda inter ili, Petro, kiu estis disĉiplo de Kristo. Kaj ĉu ci scias, kion ili faras? Jen ili preĝas por mi kaj petas por mi pri io, kion ili nomas dia favoro, sed min ekregas nur maltrankvilo kaj ĉiam pli granda sopiro je Ligia.

Mi ja skribis al ci, ke ŝi foriris sekrete, sed forirante, lasis al mi krucon, kiun ŝi mem kunligis el branĉetoj de bukso. Vekiĝinte, mi trovis ĝin apud la lito. Mi havas ĝin nun en mia lararejo kaj mi mem ne povas al mi klarigi, kial mi proksimiĝas al ĝi tiel, kvazaŭ estus en ĝi io dia, tio estas kun respekto kaj timo. Mi amas ĝin, ĉar ŝiaj manoj ĝin ligis, sed mi malamas, ĉar ĝi nin dividas. Iafoje ŝajnas al mi, ke en ĉio ĉi tio estas iaj sorĉoj kaj ke la teurgo Petro, kvankam li prezentas sin kiel simpla fiŝkaptisto, estas pli granda ol Apolonio kaj ĉiuj, kiuj estis antaŭ li, ke li sorĉis ilin ĉiujn, Ligan, Pomponian kaj min mem.

Ci skribas, ke en mia letero oni sentas maltrankvilon kaj malĝojon. La malĝojo devas esti, ĉar mi denove ŝin perdis, kaj la maltrankvilo estas tial, ke tamen io en mi ŝanĝiĝis. Sincere mi diras al ci, ke nenio estas pli kontraŭa al mia naturo ol tiu instruo, sed de la tempo, kiam mi ĝin renkontis, mi ne povas min rekoni. Ĉu sorĉo aŭ amo? Circeo ŝanĝadis per la tuŝo la homajn korpojn, sed al mi oni ŝanĝis la animon. Nur Ligia sola povis eble tion fari, aŭ pli ĝuste Ligia per tiu stranga instruo,

kiun ŝi konfesas.

*Kiam mi revenis de ili hejmen, neniu min atendis. Oni certis, ke mi estas en Benevento kaj ke ne baldaŭ mi revenos, do mi trovis hejme malordon, ebriajn sklavojn kaj festenon, kiun ili al si aranĝis en mia triklinio. Morto malpli ilin surprizus ol mi, kaj malpli ilin terurus. Ci scias, per kiel forta mano mi regas mian domanaron, do ĉiuj, kiuj estis vivaj, ĵetis sin sur la genuojn, kaj kelkaj svenis pro timo. Kaj ĉu ci scias, kiel mi agis? En la unua momento mi volis voki pri vergoj kaj ruĝvarmaj ferstangoj, sed tuj poste kaptis min ia honto, kaj ĉu ci kredos? — ia kompatato por tiuj mizeruloj: estas inter ili ankaŭ maljunaj sklavoj, kiujn ankoraŭ mia avo, Marko Vinicio, venigis en la tempo de Aŭgusto el apud Rejno. Mi fermis min sola en la biblioteko kaj tie ankoraŭ pli strangaj pensoj venis mian kapon, nome, ke post tio, kion mi vidis kaj aŭdis inter la kristanoj, ne decas al mi trakti la sklavojn tiel, kiel ĝis nun mi traktis, kaj ke ankaŭ ili estas homoj. Ili dum kelkaj tagoj vivis en morta teruro, pensante, ke mi prokrastas por elpensi pli kruelan punon, sed mi ne elpensis kaj ne punis ilin, ĉar mi ne povis! Kunvokinte ilin en la tria tago, mi diris: mi pardonas vin, kaj vi penu per diligenta servado neniigi la kulpon! Tiam ili falis sur la genuojn, verŝante larmojn, etendante kun ĝemoj la manojn kaj nomante min mastro kaj patro, dum mi — kun*

*honto mi tion diras — egale estis kortuŝita. Ŝajnis al mi, ke en tiu momento mi vidas la dolĉan vizaĝon de Ligia kaj ŝiajn okulojn, larmoplenajn, dankantajn min por tiu ago. Kaj, proh pudor!<sup>241</sup> mi sentis ankaŭ miajn pupilojn malsekiĝi ... Ĉu ci scias, kion mi al ci konfesu: nome, ke mi ne povas vivi sen ŝi, ke estas al mi malbone for de ŝi, ke mi estas simple malfeliĉa kaj ke mia malĝojo estas pli granda ol ci supozas...*

*Kaj koncerne miajn sklavojn, jen kion mi rimarkis. La pardono, kiun ili ricevis, ne nur ne igis ilin arogantaj, ne nur ne malgrandigis la disciplinon — male, neniam timo instigis ilin al tiel diligenta servado, al kia instigis ilin la dankemo. Ili ne nur servas, sed ŝajnas vetrapide diveni miajn pensojn, kaj mi mencias tion al ci tial, ke kiam tagon antaŭ la forlaso de la kristanoj mi diris al Paŭlo, ke sekve de lia instruo la mondo disfalus, kiel barelo sen ringteniloj, li diris al mi: „Amo estas pli forta ringtenilo ol teruro“. Kaj nun mi vidas, ke en certaj okazoj tiu opinio povas esti prava. Mi konvinkiĝis pri tio ankaŭ rilate al miaj klientoj, kiuj, eksciinte pri mia reveno, kunkuris por min saluti. Ci scias, ke neniam mi estis por ili tro avara, sed ankoraŭ mia patro laŭprincipe traktis ilin fiere kaj ankaŭ min kutimigis al simila traktado. Nun, vidante tiujn eluzitajn mantelojn kaj tiujn vizaĝojn, mize-*

<sup>241</sup> *proh pudor! — ho, honto!*

rajn de malsato, denove mi spertis kvazaŭ kompa-  
 tan senton. Mi ordonis, ke oni donu al ili manĝi,  
 krom tio mi parolis kun ili; kelkajn mi nomis per  
 iliaj nomoj, kelkajn mi demandis pri iliaj edzinoj  
 kaj infanoj, kaj denove mi vidis larmojn en la oku-  
 loj. Krom tio ŝajnis al mi, ke Ligia tion vidas, ke ŝi  
 ĝojas kaj laŭdas ... Ĉu mia intelekto komencas  
 erari, aŭ la amo konfuzas mian menson, mi ne sci-  
 as, mi scias tamen, ke mi ĉiam havas la senton,  
 kvazaŭ ŝi rigardas min de malproksime, kaj mi ti-  
 mas fari ion, kio povus ŝin malĝojigi kaj ofendi.  
 Jes, Gajo! Oni tamen ŝanĝis al mi la animon, kaj  
 iafoje mi estas de tio feliĉa, aliffoje turmentas min  
 tiu penso, ĉar mi timas, ke oni forprenis de mi la  
 antaŭan bravecon, la antaŭan energion, kaj ke eb-  
 le mi maltaŭgos nun ne nur al konsilo, juĝo, feste-  
 noj, sed eĉ al milito. Tio sendube estas sorĉo!  
 Kaj tiagrade oni min ŝanĝis, ke mi diros al ci an-  
 kaŭ, kio venadis en mian kapon tiam ankoraŭ,  
 kiam mi kuŝis malsana: ke se Ligia estus simila al  
 Nigidia, al Popea, al Krispinilla kaj al niaj aliaj  
 eksedzinoj, se ŝi estus same malĉasta, same sen-  
 kompata kaj same facile havebla, kiel ili, tiam mi  
 ŝin ne amus tiel, kiel mi amas. Sed, se mi amas ŝin  
 pro tio, kio nin dividas, ci divenas, kia ĥaoso nask-  
 iĝas en mia animo, en kia mallumo mi vivas, kiel  
 malklare mi vidas mian vojon kaj kiagrade mi ne  
 scias, kion fari pri mi mem. Se oni povas kompari

vivon al fonto, en mia fonto anstataŭ akvo fluas maltrankvilo. Mi vivas per la espero, ke mi ŝin eble revidos, kaj iafoje ŝajnas al mi, ke tio devas okazi ... Sed kio estos pri mi post jaro aŭ du jaroj, mi ne scias kaj ne povas diveni.

Romon mi ne forlasos. Mi ne povus elporti la societon de la aŭgustanoj, kaj krom tio la sola konsolo en mia malĝojo estas la fakto, ke mi estas proksime de Ligia, ke pere de Glaŭko la kuracisto, kiu promesis min viziti, aŭ pere de Paŭlo el Tarso eble de tempo al tempo mi ion ekscios pri ŝi. Ne! Mi ne forlasus Romon, eĉ se oni oferus al mi la prefektecon de Egiptujo. Sciu ankaŭ, ke mi ordonis al skulptisto fari tomboŝtonon por Gulono, kiun mi mortigis en kolero. Tro malfrue mi ekpensis, ke li vartis min sur la brakoj kaj ke li kiel unua instruis min, kiel meti sagon sur pafarkon. Mi ne scias, kial nun vekigis en mi la memoro pri Gulono, simila al bedaŭro kaj riproĉo ... Se cin mirigas tio, kion mi skribas, mi respondos, ke min ĝi mirigas ne malpli multe, sed mi skribas al ci puran veron. Adiaŭ!»

## Ĉapitro 29<sup>a</sup>

Al tiu letero Vinicio jam ne ricevis respondon, ĉar Petronio ne skribis, esperante videble, ke la imperiestro hodiaŭ-morgaŭ ordonos revenon en Romon. La famo pri tio disvastiĝis efektive tra la Urbo kaj vekis grandan ĝojon en la koroj de la stratamaso, sopiranta cirkludojn kaj disdonadon de greno kaj de olivoleo, da kiuj grandaj provizoj estis amasigitaj en Ostio. Helio, liberigito de Nerono, anoncis fine en la senato lian revenon. Sed Nerono, enŝipiĝinte kun sia kortego ĉe la promontoro Miseno, revenis malrapide, vizitante envoje apudbordajn urbojn por tie ripozi aŭ prezentiĝi en teatroj. En Minturnoj, kie li denove kantis publike, li restis dekelkajn tagojn kaj konsideris eĉ, ĉu reveni en Neapolon kaj atendi tie la alvenon de la printempo, kiu cetere iĝadis pli frua ol ordinare kaj varma.

Dum la tuta tempo Vinicio vivis fermite en sia domo, kun la penso pri Ligia kaj pri ĉiuj tiuj novaj aferoj, kiuj okupis lian animon, enportante en ĝin ideojn kaj sentojn, kiuj ĝis tiam estis al ĝi fremdaj. Li vidadis nur de tempo al tempo Glaŭkon la kuraciston, kies ĉiu vizito inspiradis al li internan ĝojon, ĉar li povis paroli kun li pri Ligia. Glaŭko ne sciis, vere, kie ŝi trovis rifuĝon, li certigis tamen Vinicion, ke la ĉefuloj ĉirkaŭigis ŝin per sindona zorgemo.



Foje, tuŝite de la malĝojo de Vinicio, Glaŭko diris al li, ke la apostolo Petro mallaŭdis Krispon pro ties riproĉio al Ligia pri ŝia tera amo. Ekaŭdinte ĉi tion la juna patricio paliĝis de kortuŝo.

Ankaŭ al li ŝajnis fojfoje, ke li ne estas indiferenta al Ligia, sed egale ofte kaptadis lin dubo kaj necerteco. Nun unuafoje li ekaŭdis la konfirmon de siaj deziroj kaj esperoj el la buŝo de alia homo, kaj plie de kristano. En la unua momento de dankemo li volis kuri al Petro, kaj eksciinte, ke tiu forestas el la Urbo, li petegis Glaŭkon, ke li konduku lin al la apostolo, promesante por tio malavarajn donacojn por la malriĉuloj de la komunumo. Ŝajnis al li ankaŭ, ke se Ligia lin amas, per tiu sola fakto ĉiuj baroj estas forigitaj, ĉar li estas preta ĉiumomente ekadori Kriston. Sed Glaŭko, kvankam li insiste inklinigis la junan patricion akcepti bapton, ne kuraĝis al li tamen garantii, ĉu li per tio tuj akiros Ligian, kaj li diris al Vinicio, ke bapton oni devas deziri por la bapto mem, ne por aliaj celoj. «Oni devas havi ankaŭ la animon kristanan», — li diradis al la juna tribunuso, — kaj Vinicio, kvankam ĉia malhelpo incitegis lin, komencis jam kompreni, ke Glaŭko, kiel kristano, diras tion, kion li devas diri. Li mem ne konsciis klare, ke unu el la plej profundaj ŝanĝoj de lia naturo konsistis en tio, ke antaŭe li mezuradis la homojn kaj aferojn nur

per sia egoismo, dum nun, iom post iom li al kutimiĝadis al la penso, ke aliaj okuloj povas alie rigardi, alia koro alie senti, kaj ke praveco ne ĉiam estas samsignifa kun persona profito.

Ofte li sentis la deziron vidi Paŭlon el Tarso, kies vortoj vekis kune lian intereson kaj maltrankvilon. Li preparis al si en la animo argumentojn, per kiuj li kontraŭparolos lian instruon, li kontraŭstaris lin en la penso, li volis lin tamen vidi kaj aŭdi. Sed Paŭlo iris en Aricion, kaj kiam ankaŭ la vizitoj de Glaŭko komencis iĝi ĉiam pli maloftaj, Vinicion ekĉirkaŭis kompleta soleco.

Tiam li denove komencis trakuradi la stratetojn najbarajn al Suburo, kaj la mallarĝajn vojetojn de Transtibero, esperante tie ekvidi Ligian, eĉ se nur de malproksime; sed kiam ankaŭ ĉi tiu espero montriĝis vana, en lia koro komencis kreski enuo kaj malpacienco. Venis fine la tempo, ke la antaŭa naturo reekparolis en li kun tia forto, kun kia flusa ondo revenas al la forlasita bordo. Al li ekŝajnis, ke li estis malsaĝulo, ke senbezone li okupas sian kapon per aferoj, kiuj lin malgajigas, kaj ke li devas preni el la vivo, kion li povas. Li decidis forgesi pri Ligia, aŭ almenaŭ serĉi volupton kaj vivoĝuon ekster ŝi.

Sentante tamen, ke tio estas la lasta provo, li sin ĵetis en la ĥaoson de la vivo kun la tute blindaj, al li propraj

pasio kaj energio. La vivo mem ŝajnis lin logi al tio. La urbo, kvazaŭ mortinta kaj senhomiĝinta en la vintro, komencis vigliĝi per la espero pri la baldaŭa reveno de la imperiestro. Oni preparis por li solenan akcepton. Krom tio la printempo estis venanta: de la spiro de afrikaj ventoj malaperis la neĝoj sur la pintoj de la Albana montaro. La ĝardenaj herbejoj kovriĝis per violoj. La forumoj kaj la Kampo de Marso eksvarmis per homoj, kiujn karesis ĉiam pli varma suno. Sur la Vojo Appia, kiu estis ordinara loko de eksterurbaj veturpromenoj, ekregis la movado de riĉe ornamitaj veturiloj. Oni jam faris ekskursojn en la Albanan montaron. Junaj virinoj, pretekstante adorsaluti Junon en Lanuvio aŭ Dianon en Aricio, eliĝadis el siaj domoj, por ekster la Urbo serĉi impresojn, societon, renkontojn kaj volupton.

Tie, inter grandiozaj veturiloj, iun tagon Vinicio rimarkis, antaŭatan de du molosoj, imponan kaleŝon de la petronia Ĥrizotemiso, ĉirkaŭita de tuta aro da junuloj kaj maljunaj senatanoj, kiujn la ofico retenis en la Urbo. Ĥrizotemiso, mem direktante kvar malgrandajn korsikajn ĉevalojn, disdonadis ĉirkaŭen ridetojn kaj facilajn batojn per ora vipo; sed, rimarkinte Vinicion, ŝi haltigis la ĉevalojn, lin invitis en sian kaleŝon kaj poste hejmen al festeno, kiu daŭris la tutan nokton. Vinicio tiel ebriiĝis dum

tiu festeno, ke li eĉ ne memoris, kiam oni forprenis lin hejmen; li tamen rememoris, ke kiam Ĥrizotemiso demandis lin pri Ligia, li ofendiĝis kaj, estante jam ebria, verŝis sur ŝian kapon pokalon da falerno. Pensante pri tio jam sobre, li ankoraŭ sentis koleron. Sed tagon poste Ĥrizotemiso, forgesinte videble la ofendon, lin vizitis en lia hejmo kaj denove lin kunprenis sur la Appian vojon; poste ŝi vespermanĝis ĉe li, dum kio ŝi konfesis, ke ne nur Petronio, sed ankaŭ lia liutisto tedas ŝin jam delonge kaj ke ŝia koro estas libera. Dum semajno oni vidadis ilin kune, sed la rilato ne promesis esti daŭra.

Kvankam post la incidento kun la falerno la nomo de Ligia neniam plu estis elparolita, Vinicio ne povis liberiĝi de la penso pri ŝi. Ĉiam li havis la senton, ke ŝiaj okuloj lin rigardas, kaj tiu sento traigadis lin kvazaŭ per timo. Li koleris kontraŭ si mem, ne povante tamen liberiĝi de la penso, ke li ĉagrenas Ligian, nek de la bedaŭro, kiu naskiĝadis el tiu penso.

Post unua sceno de ĵaluzo, kiun Ĥrizotemiso faris al li pro du siriaj knabinoj, kiujn li aĉetis, li forpelis ŝin krudmaniere. Li vere ne tuj ĉesis sin bani en volupto kaj diboĉo; kontraŭe, li faris tion kvazaŭ spite al Ligia; sed fine li rimarkis, ke la penso pri ŝi ne forlasas lin eĉ por momento, ke ŝi ekskluzive estas la kaŭzo de liaj kaj bonaj kaj

malbonaj agoj, kaj ke efektive krom ŝi nenio en la mondo lin interesas. Tiam lin ekregis malplaĉo kaj laceco. La volupto iĝis al li abomena kaj postlasis nur riproĉojn. Al li ŝajnis, ke li estas malnoblulo, kaj tiu sento plenigis lin per senlima mirego, ĉar antaŭe li konsideradis bona ĉion, kio estis al li plezura. Fine li perdis la liberecon, la memcertecon kaj dronis en kompleta sensenteco, el kiu ne povis lin vekti eĉ la famo pri la reveno de la imperiestro. Nun jam nenio lin interesis kaj eĉ Petronion li ne vizitis ĝis tiu sendis al li inviton kaj sian portilon.

Ĉe la onklo, kvankam salutite kun ĝojo, Vinicio respondadis ties demandojn malvolonte; tamen fine la longe sufokataj sentoj kaj pensoj eksplodis kaj ekfluis el lia buŝo per abunda torento. Refoje li detale rakontis la historion pri sia serĉado de Ligia kaj pri sia restado inter la kristanoj, ĉion, kion li tie vidis kaj aŭdis, ĉion, kio trairis lian kapon kaj koron; kaj fine li komencis plendi, ke li falis en ĥaoson, en kiu li perdis la trankvilon, kapablon distingadi la aferojn kaj juĝon pri ili. Jen nenio lin logas, nenio al li plaĉas, li ne scias, en kio persisti kaj kiel agi. Li egale pretas adori Kriston kaj persekuti lin; li komprenas la altecon de lia instruo, kaj kune sentas al ĝi nevenkeblan abomenon. Li komprenas, ke se li eĉ ekposedus Ligian, li ne posedus ŝin plene, ĉar li devus dividi ŝin kun Kristo.

Fine li vivas, kvazaŭ li ne vivus: sen espero, sen morgaŭo, sen kredo je feliĉo, kaj ĉirkaŭ li estas mallumo, el kiu li palpe serĉas eliron kaj ne povas ĝin trovi.

Petronio rigardis dum la rakontado lian ŝanĝiĝintan vizaĝon, la manojn, kiujn li, parolante, etendadis antaŭen en stranga maniero, kvazaŭ efektive li serĉus vojon en mallumo, kaj meditis. Subite li leviĝis kaj, proksimiĝinte al Vinicio, komencis disŝovi per la fingroj liajn harojn super la orelo.

— Ĉu ci scias, — li demandis, — ke ci havas kelkajn grizajn harojn sur la tempioj?

— Povas esti, — respondis Vinicio. — Mi ne miros, se baldaŭ ili ĉiuj griziĝos.

Sekvis silento. Petronio estis inteligenta homo kaj ofte li pensadis pri la homa animo kaj pri la vivo. Ĝenerale la vivo en la mondo, al kiu ili ambaŭ apartenis, ekstere povis esti feliĉa aŭ malfeliĉa; sed interne ĝi estis trankvila. Same kiel tondrobato aŭ tertremo povis faligi templon, tiel malfeliĉo povis detrui la vivon; tamen ĝi mem konsistis el linioj rektaj kaj harmoniaj, liberaj je ĉiaj implikaĵoj. Kaj jen io alia estis en la vortoj de Vinicio, kaj unuafoje Petronio ekstaris antaŭ vico da spiritaj nodoj, pri kies malligo neniu ĝis nun sin okupis. Li estis tiom inteligenta, ke li sentis ilian gravecon, sed malgraŭ sia tuta sagaco li sciis neni-

on respondi al la farita demando — kaj fine, post longa momento da silento, li diris:

— Tio devas esti sorĉo.

— Ankaŭ mi tiel pensis, — respondis Vinicio, — ofte ŝajnis al mi, ke oni sorĉis nin ambaŭ.

— Kaj se ci irus, — diris Petronio, — ekzemple al la pastroj de Serapo? Sendube estas inter ili, kiel ĝenerale inter la pastroj, multaj ĉarlatanoj, sed estas ankaŭ tiaj, kiuj penetris strangajn misterojn.

Sed li parolis sen konvinko kaj per necerta voĉo, ĉar li mem sentis, kiel senvalore kaj eĉ ridinde tia konsilo povis soni en lia buŝo.

Vinicio komencis froti la frunton — kaj diris:

— Sorĉoj! Mi vidis sorĉistojn, kiuj uzadis subterajn, ne konatajn fortojn por sia profito, mi vidis ankaŭ tiajn, kiuj uzadis ilin kontraŭ siaj malamikoj. Sed la kristanoj vivas en malriĉeco, pardonas la malamikojn, proklamas humilcon, virton kaj kompatemon — kion do ili profitus el sorĉoj kaj kial ili uzus ilin?

Petronio komencis inciti, ke lia intelekto al nenio povas respondi; ne volante tamen tion konfesi, li respondis nur por doni ian ajn respondon:

— Tio estas nova sekto.

Kaj post momento li diris:

— Je la dia loĝantino de la Pafosaj boskoj, kiel ĉio tio konfuzas la vivon! Ci admiras la bonecon kaj virton de tiuj homoj, sed mi diras al ci, ke ili estas malbonaj, ĉar ili estas malamikoj de la vivo, kiel malsanoj kaj kiel la morto mem. Ni jam havas sufiĉe! Ni ne bezonas ankoraŭ la kristanojn. Kalkulu nur: la malsanoj, Nerono, Tigeleno, la versaĵoj de Nerono, la ŝuistoj, kiuj regas la posteulojn de la iamaj *kviritoj*, la liberigitoj kiuj kunsidas en la senato... Je Kastoro! Sufiĉe. Ĝi estas pereiga kaj abomena sekto. Ĉu ci provis almenaŭ forskui de ci tiujn malĝojojn kaj ĝui iom la vivon?

— Mi provis, — respondis Vinicio.

Petronio ekridis kaj diris:

— Ha, perfidulo! Novaĵoj rapide diskoniĝas pere de sklavoj: ci delogis mian Ĥrizotemison!

Vinicio movis la manon kun malplaĉo.

— Ĉiuokaze mi dankas al ci, — parolis Petronio. — Mi sendos al ŝi paron da perlobroditaj ŝuoj; en mia ama lingvo ĝi signifas: «foriru». Mi ŝuldas al ci duoblan dankon: unue pro tio, ke ci ne akceptis Eŭnikon; due, ĉar ci liberigis min de Ĥrizotemiso. Aŭskultu min: ci vidas antaŭ ci homon, kiu leviĝadis matene, banadis sin, festenadis, posedis Ĥrizotemison, verkadis satirojn kaj iafoje eĉ interplektadis prozon per versaĵoj, sed kiu enuis, kiel la impe-



riestro, kaj ofte ne sciis forpeli de si malserenajn pensojn. Kaj ĉu ci scias, kial tiel estis? Jen tial, ke mi serĉis malproksime tion, kio estis proksime. Bela virino ĉiam valoras tiom da oro, kiom ŝi pezas, sed virino, kiu krom tio amas, simple ne havas prezon. Tion oni ne povas aĉeti por ĉiuj trezoroj de Verreso<sup>242</sup>. Nun mi diras al ci la jenon: mi plenigas la vivon per feliĉo, kiel pokalon per plej bona vino, kiun la tero produktis, kaj mi trinkos, ĝis mia mano rigidiĝos kaj paliĝos la buŝo. Kio estos poste, mi ne zorgas, kaj ĉi tio estas mia plej nova filozofio.

— Ci ĝin ĉiam konfesis: estas en ĝi nenio nova!

— Estas en ĝi la enhavo, kiu antaŭe mankis.

Dirinte tion, li vokis Eŭnikon, kiu eniris, vestita per blanka drapiraĵo, ne plu la antaŭa sklavino, sed kvazaŭ diino de amo kaj feliĉo.

Kaj li malfermis al ŝi la brakojn kaj diris:

— Venu!

Je tio ŝi alkuris al li kaj, sidiĝinte sur liaj genuoj, ĉirkaŭplektis lian kolon per la brakoj, metante la kapon sur lian bruston. Vinicio vidis ŝiajn vangojn iom post iom koloriĝi je nuanco de purpuro, ŝiajn okulojn grade droni en nebulo. Kune ili prezentis mirindan grupon aman kaj fe-

<sup>242</sup> C. Verres (120–43 a.K.) treege riĉiĝis per prirabado de Sicilio, kiun li misregis en 73–71 a.K. Cicerono komencis sian publikan karieron per siaj 5 akuzaj paroladoj «Kontraŭ Verreso» (*In Verrem*).

liĉan. Petronio etendis la manon al plata vazo, staranta apude sur tableto, kaj, eliginte el ĝi manplendon da violoj, komencis ŝuti ilin sur la kapon, bruston kaj stolon de Eŭniko; poste li deŝovis la tunikon de ŝiaj ŝultroj kaj diris:

— Feliĉa estas, kiu, kiel mi, Loĝantan en simila formo amon trovis...<sup>243</sup> Ŝajnas al mi iafoje ke ni estas paro da di-oj ... Rigardu mem: ĉu Praksitelo, ĉu Mirono<sup>244</sup>, ĉu Skopaso, ĉu Lizipo kreis iam pli mirindajn liniojn? Ĉu sur Paroso aŭ sur Pentelikono estas simila marmoro, varma, rozkolora kaj amanta? Ekzistas homoj, kiuj forkisas la randojn de vazoj, sed mi preferas serĉi volupton tie, kie oni ĝin vere povas trovi.

Dirinte ĉi tion, li komencis ŝovi la buŝon sur ŝiaj ŝultroj kaj kolo; Eŭnikon traigadis tremoj kaj ŝiaj okuloj jen fermiĝadis, jen malfermiĝadis kun esprimo de nedirebla volupto. Petronio levis post momento sian elegantan kapon kaj, sin turninte al Vinicio, diris:

— Pensu nun, kio estas kompare kun tio cial malsere-naj kristanoj? Kaj se ci ne komprenas la diferencon, iru mem al ili ... Sed ĉi tiu vido cin kuracos.

Vinicio disblovis la nazon, kiun eniris la aromo de la

<sup>243</sup> La ritmo kaj esprimmaniero de tiu repliko sonas versaĝe. La redaktoro de la INKO-eldono tion ne rimarkis kaj banaligis: «trovis amon loĝantan en simila formo».

<sup>244</sup> **Mirono** (gr. Μύρων) — malnovgreka skulptisto kaj bronzisto de mezo de la 5-a jarcento a.K., aŭtoro de la «Diskobolo».

violoj, pleniganta la tutan ĉambron, kaj li paliĝis, ĉar li ekpensis, ke se li povus tiel movi la buŝon sur la ŝultroj de Ligia, tio estus sakrilegia volupto, tiel grandega, ke poste pereu eĉ la mondo. Sed kutimiĝinte jam rapide konsciigi al si, kio al li okazas, li rimarkis, ke eĉ en tiu momento li pensas pri Ligia, nur pri ŝi.

Kaj Petronio diris:

— Eŭniko, mia dia, ordonu prepari al ni florkronojn por la kapoj kaj matenmanĝon.

Poste, kiam ŝi foriris, li sin turnis al Vinicio:

— Mi volis ŝin liberigi, sed ĉu ci scias, kion ŝi al mi respondis? «Mi preferus esti cia sklavino ol edzino de la imperiestro». Kaj ŝi ne volis konsenti. Tiam mi ŝin liberigis sen ŝia scio. La pretoro faris por mi tion, ke li ne postulis ŝian ĉeeston. Sed ŝi ne scias tion, same, kiel ŝi ne scias, ke ĉi tiu domo kaj ĉiuj miaj juveloj, krom la gemoj, apartenos al ŝi en okazo de mia morto.

Dirinte tion, li leviĝis, iom promenis tra la ĉambro kaj diris:

— Amo ŝanĝas kelkajn pli multe, aliajn malpli, sed ĝi ŝanĝis ankaŭ min. Iam mi ŝatis la odoron de verbeno, sed ĉar Eŭniko preferas violojn, ankaŭ mi ekŝatis ilin super ĉio alia, kaj de kiam la printempo venis, ni spiras nur per violoj.

Ĉe tio li haltis antaŭ Vinicio kaj demandis:

— Kaj ci? Ĉu ci ĉiam estas fidela al nardo?

— Lasu min trankvila! — respondis la juna viro.

— Mi volis, ke ci rigardu Eŭnikon, kaj mi rakontas al ci pri ŝi tial, ke eble ankaŭ ci serĉas malproksime tion, kio estas proksime. Eble ankaŭ por ci ie en ciaj sklavaj ĉambroj batas koro fidela kaj simpla. Metu tian balzamon sur ciajn vundojn. Ci diras, ke Ligia cin amas? Povas esti! Sed kio estas tia amo, kiu rezignas? Ĉu ĝi ne signifas, ke estas io pli forta ol ĝi? Ne, mia kara: Ligia ne estas Eŭniko.

Al tio Vinicio respondis:

— Ĉio estas unu senĉesa turmento. Mi vidis cin kisi la ŝultrojn de Eŭniko, kaj mi ekpensis tiam, ke se Ligia tiel malkovrus al mi la siajn, tiam poste eĉ la tero malfermiĝu sub ni! Sed ĉe la nura penso pri tio min kaptis ia timo, kvazaŭ mi atencus kontraŭ vestalo aŭ volus perforti diinon. Ligia ne estas Eŭniko, nur mi alie komprenas tiun diferencon ol ci. Al ci la amo ŝanĝis la flarsenton, do ci preferas violojn ol verbenon, kaj al mi ĝi ŝanĝis la animon, do mi preferas, ke Ligia estu tia, kia ŝi estas ol ke ŝi estu simila al aliaj virinoj.

— En tiu okazo la sorto ne maljustas kontraŭ ci. Sed mi tion ne komprenas.

Kaj Vinicio respondis febre:

– Jes! Jes! Ni ne plu povas kompreni nin reciproke.

Sekvis denove momento da silento, post kio Petronio diris:

– Hadeso englutu ciajn kristanojn! Ili plenigis cin per maltrankvilo kaj detruis cian vivpercepton. Hadeso ilin englutu! Ci eraras pensante ke ilia instruo estas bonfara, ĉar bonfara estas tio, kio donas al la homoj feliĉon, tio estas belo, amo kaj potenco, dum ili nomas tiojn vantaĵoj. Ci eraras, ke ili estas justaj, ĉar se por malbono ni pagos bonon, kion ni pagos tiam por bono? Krome, se por ambaŭ estos egala pago por kio la homoj estu bonaj?

– Ne: la pago ne estas egala, sed ĝi komenciĝas, laŭ ilia instruo, en la postmorta vivo, kiu ne havas limon.

– Pri tio mi ne diskutos, ĉar tion ni nur poste vidos, se ĝenerale oni povas ion vidi ... sen la okuloj. Dume ili taŭgas simple por nenio. Urso sufokis Krotonon, ĉar li havas membrojn el fero; sed ili estas nubmensuloj, kaj la estonteco ne povas aparteni al nubmensuloj.

– La vivo komenciĝas por ili kun la morto.

– Estas, kvazaŭ ci dirus: la tago komenciĝas kun la nokto. Ĉu ci intencas forkapti Ligian?

– Ne, mi ne povas pagi al ŝi per malbono por la bono kaj mi ĵuris, ke mi tion ne faros.

– Ĉu ci intencas akcepti la instruon de Kristo?

- Mi volas, sed mia naturo tion ne elportas.
- Kaj ĉu ci kapablos forgesi pri Ligia?
- Ne.
- Do vojaĝu.

En tiu momento sklavoj sciigis, ke la matenmanĝo estas preta; sed Petronio, al kiu ŝajnis ke li kaptis bonan ideon, daŭrigis envoje al la triklinio:

— Ci tramigris grandan parton de la mondo, sed nur kiel soldato, kiu rapidas al la destinita loko kaj ne haltas envoje. Veturu kun ni en Aĥajon. La imperiestro ne forlasis ĝis nun la projekton de la vojaĝo. Li haltados ĉie envoje, kantados, kolektados laŭrokronojn, rabados trezorojn de temploj kaj fine li revenos, kiel triumfanto, en Italujon. Tio estos kvazaŭ triumfiro de Bakĥo kaj Apolono en unu persono. La aŭgustanoj, la aŭgustaninoj, miloj da citroj — je Kastoro! Valoras tion vidi, ĉar la mondo vidis ĝis nun nenion similan.

Dirante ĉi tion, li sin kuŝigis sur benkon antaŭ la tablo, apud Eŭniko, kaj dum sklavo metis sur lian kapon kronon el anemonoj, li parolis plu:

— Kion ci vidis sub la komando de Korbulono? Neni-  
on! Ĉu ci vizitis sisteme la grekajn templojn, kiel mi, kiu pli ol du jarojn pasadis el la manoj de unu gvidisto en la manojn de alia? Ĉu ci estis sur Rodoso por vidi la lokon,

kie staris la koloso? Ĉu ci vidis en Panopo, en Focido<sup>245</sup>, la argilon, el kiu Prometeo formis la homojn, aŭ en Sparto la ovojn, eligitajn de Ledo, aŭ en Ateno la faman sarmatan kirason el ĉevalhufoj, aŭ la pokalon, gisitan laŭ la maldekstra mammo de Heleno? Ĉu ci vidis Aleksandrion, Memfison, la piramidojn, la haron de Izido, kiun ŝi elŝiris, priplorante Ozirison? Ĉu ci aŭdis la ĝemon de Memnono? La mondo estas vasta kaj ne ĉio finiĝas en Transtibero! Mi akompanos la imperiestron, kaj poste, revenante, mi lin forlasos, ĉar ĉi tiu mia orhara nimfo deziras, ke ni kune oferu en Pafoso kolombojn al Kipridino, kaj ci devas scii, ke kion ŝi deziras, tio fariĝas.

— Mi estas cia sklavino, — respondis Eŭniko.

Kaj li apogis sian florkronitan kapon sur ŝian sinon kaj diris kun rideto:

— Mi estas do sklavo de sklavino. Mi cin admiras, dia, de la piedoj ĝis la kapo.

Poste li diris al Vinicio:

— Veturu kun ni sur Kipron. Antaŭe tamen memoru, ke ci devas vidi la imperiestron. Malbone estas, ke ĝis nun ci lin ne vizitis; Tigeleno estas preta elprofiti tion kontraŭ ci. Li vere ne havas kontraŭ ci personan malamon, sed li ne povas cin ami almenaŭ tial, ke ci estas mia nevo ... Ni

<sup>245</sup> **Panopo** (gr. Πανοπέυς) — urbo en **Focido** [PIV] (gr. Φωκίς, parto de la antikva Greklando norden de la Korinta golfo).

diros, ke ci estis malsana. Ni devas pripensi, kion ci respondu, se li cin demandos pri Ligia. Plej bone svingu la manon kaj diru al li, ke ŝi estis ĉe ci, ĝis ŝi cin ektedis. Li tion komprenos. Diru al li ankaŭ, ke malsano retenis cin hejme, ke la febron pligrandigis la ĉagreno, ke ci ne povis esti en Neapolo kaj aŭdi lian kantadon, kaj la espero, ke ci lin aŭdos, helpis cian resaniĝon. Ne timu troigi. Tigeleno promesas, ke li elpensos por Nerono ion ne nur grandiozan, sed ankaŭ frapan ... Mi tamen timas, ke li min eble subfosos. Mi timas ankaŭ cian animstaton...

— Ĉu ci scias, — diris Vinicio, — ke estas homoj, kiuj ne timas la imperiestron kaj vivas tiel trankvile, kvazaŭ li tute ne ekzistus?

— Mi scias, kiujn ci nomos: la kristanojn.

— Jes. Ili solaj ... Kio estas dume nia vivo, se ne senĉesa timo?

— Ne tedu min per cial kristanoj. Ili ne timas Neronon, ĉar li eble eĉ ne aŭdis pri ili; ĉiuokaze li nenion pri ili scias kaj ili gravas al li tiom, kiom velkintaj folioj. Sed mi diras al ci, ke ili estas nubmensuloj, ke ci mem tion sentas kaj ke, se cia naturo forpuŝas tiun instruon, tio estas ĝuste tial, ke ci sentas ilian maltaŭgecon. Ci estas homo el alia argilo, kaj tial ne tedu per ili cin mem kaj min. Ni scipovas vivi kaj morti, sed kion ili scipovas, oni ne scias.



Vinicion frapis tiuj vortoj kaj, reveninte hejmen, li komencis konsideri, ĉu efektive tiu boneco kaj kompatemo de la kristanoj ne pruvas maltaŭgecon de iliaj animoj. Ŝajnis al li, ke homoj bravaj, harditaj ne povus tiel pardonadi. Venis al li la penso, ke efektive ĉi tio estas eble la kaŭzo de la abomeno, kiun lia romana naturo sentas al tiu instruo. «Ni scipovas vivi kaj morti!» — diris Petronio. Kaj ili? Ili scipovas nur pardonadi, sed komprenas nek veran amon, nek veran malamon.

## Ĉapitro 30<sup>a</sup>

Reveninte Romon, Nerono bedaŭris sian revenon, kaj post kelkaj tagoj li jam ekflamis denove per la deziro veturi en Grekujon. Li eĉ eldonis edikton, en kiu li deklaris, ke lia foresto ne daŭros longe kaj ke la publikajn aferojn minacos pro tio nenia malutilo. Poste, akompanate de la aŭgustanoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ Vinicio, li iris sur Kapitolon oferdoni al la dioj por la feliĉa vojaĝo.

Sed la duan tagon, kiam li vizitis laŭvice la sanktejon de Vesto, okazis incidento, kiu sekvigis ŝanĝon de ĉiuj projektoj. Nerono ne kredis je la dioj, sed li timis ilin, kaj precipe la mistera Vesto inspiris al li tian timon, ke ĉe la vido de la diino kaj de la sankta fajro liaj haroj hirtiĝis subite pro timo, la dentoj kunpremiĝis, tremo trakuris liajn

membrojn kaj li svenfalis en la brakojn de Vinicio, kiu hazarde staris tuj post li. Oni elportis lin senprokraste el la templo kaj transkondukis sur Palatinon, kie, kvankam lia farto baldaŭ tute reboniĝis, li ne forlasis la liton dum la tuta tago. Li ankaŭ deklaris, je granda miro de la ĉeestantoj, ke li decidis prokrasti por kelka tempo la projekton de la forveturo, ĉar la diino mistere avertis lin kontraŭ la rapidemo.

Horon poste oni publike anoncis al la popolo en la tuta Romo, ke la imperiestro, vidante la ĉagrenitajn vizaĝojn de la civitanoj, direktate de amo al ili, de la amo de patro al siaj infanoj, restas kun ili por dividi iliajn ĝojojn kaj sorton. La popolo, ĝoja pro tiu decido kaj kune certa, ke la cirkludoj kaj disdonado de greno ne estos preterlasitaj, amasiĝis grandare antaŭ la pordego de Palatino, eligante ekkriojn honore al la dia imperiestro, dum tiu interrompis kubludadon, per kiu li sin amuzis kun la aŭgustanoj, kaj diris:

— Jes, necesis prokrasti. Egiptujo kaj la regado de Oriento, laŭ la aŭguro, ne povas pasi preter mi, do ankaŭ Aĥajo ne estos perdita. Mi ordonos trafosi la korintan istmon, kaj en Egiptujo ni konstruos tiajn monumentojn, ĉe kiuj la piramidoj ŝajnos infanaj ludiloj. Mi ordonos konstrui Sfinkson sepoble pli grandan ol tiu, kiu apud

Memfiso rigardas en la dezerton, sed mi ordonos doni al ĝi mian vizaĝon. La postaj generacioj parolos nur pri tiu monumento kaj pri mi.

— Ci jam konstruis al ci per la versaĵoj monumenton ne sepoble, sed trioble sepoble pli grandan ol la piramido de Ĥeopso, — diris Petronio.

— Kaj per la kanto? — demandis Nerono.

— Bedaŭrinde! Se oni kapablos konstrui al ci statuon, kiel la statuo de Memnono, kiu sonigus cian voĉon je sunleviĝo! La maroj ĉe la egiptaj bordoj svarmus eterne de ŝipoj, sur kiuj amasoj el la tri mondopartoj aŭskultus avide ciajn kantojn.

— Bedaŭrinde, kiu kapablos tion? — diris Nerono.

— Sed ci povas ordoni skulpti cin el bazalto, veturiganta kvadrigon.

— Prave! Mi faros tion!

— Ci faros donacon al la homaro.

— En Egiptujo mi ankaŭ edziĝos al Luno, kiu estas vidvino, kaj mi iĝos vera dio.

— Kaj nin ci edzigos al steloj, kaj ni formos novan stelaron, nomotan la stelaro Nerona. Vitelion tamen edzigu al Nilo, ke li naskigadu hipopotamojn. Al Tigeleno donacu dezerton; li estos tiam reĝo de ŝakaloj...

— Kaj kion ci destinas por mi? — demandis Vatinio.

— Benu cin Apiso! Ci aranĝis al ni tiel grandiozajn ludojn en Benevento, ke mi ne povas malbondeziri al ci: kudru paron da ŝuoj por Sfinkso, kies piedegoj rigidiĝas de la noktaj rosoj, kaj poste ci kudros ŝuojn por la kolosoj, formantaj aleojn antaŭ la temploj. Ĉiu trovos tie konvenan okupon. Ekzemple Domicio Afro, konata pro sia honesteco, estos trezoristo. Mi ŝatas, Cezaro, aŭdi cin revipri Egiptujo, kaj min ĉagrenas ke ci prokrastis la projektion de la vojaĝo.

Sed Nerono diris:

— Viaj mortemulaj okuloj nenion vidis, ĉar la dioj sin igas nevideblaj por kiuj ili volas. Sciu, ke kiam mi estis en la templo de Vesto, ŝi mem ekstaris apud mi kaj diris rekte en mian orelon: «Prokrastu la vojaĝon». Tio okazis tiel neatendite, ke mi teruriĝis, kvankam pro tiel evidenta zorgemo, kiun la dioj al mi elmontris, mi devus esti danka al ili.

— Ni ĉiuj teruriĝis, — diris Tigeleno, — kaj la vestalo Rubria svenis.

— Rubria! — diris Nerono, — kiel neĝe blankan kolon ŝi havas.

— Sed ŝi ruĝiĝas ĉe cia vido, dia Cezaro...

— Jes! Ankaŭ mi tion rimarkis. Strange! Vestalo! Estas io dia en ĉiu vestalo, kaj Rubria estas tre bela.

Ĉe tio Nerono enpensiĝis momente, poste li demandis:

— Diru al mi, kial Veston la homoj timas pli ol la aliajn diojn? Kio estas en tio? Jen min mem ekposedis timo, kvankam mi estas ŝia ĉefpastro. Mi nur memoras, ke mi estis falanta malantaŭen, kaj estus falinta dorsaltere, se iu min ne subtenus. Kiu min subtenis?

— Mi, — respondis Vinicio.

— Ha, ci, «timinda Areso»? Kial ci ne estis en Benevento? Oni diris al mi, ke ci estis malsana, kaj efektive cia vizaĝo estas ŝanĝita. Ha! Mi aŭdis, ke Krotono volis cin murdi? Ĉu tio estas vero?

— Jes — kaj li rompis al mi la brakon: sed mi defendiĝis.

— Per la rompita brako?

— Helpis min unu barbaro, kiu estis pli forta ol Krotono.

Nerono rigardis lin kun miro:

— Pli forta ol Krotono? Ci ŝercas! Krotono estis la plej forta el ĉiuj homoj, kaj nun estas Sifako el Etiopujo.

— Mi diras al ci, Cezaro, kion mi vidis per miaj okuloj.

— Kie estas tiu perlo? Ĉu li iĝis Nemorena reĝo?

— Mi ne scias, Cezaro. Mi ne vidis lin plu.

— Ci eĉ ne scias, el kiu nacio li estas?

— Mi havis rompitan brakon, do mi povis de li nenion eldemandi.

— Serĉu lin por mi kaj retrovu.

Al tio Tigeleno diris:

— Mi min okupos pri tio.

Sed Nerono parolis plu al Vinicio:

— Mi dankas cin, ke ci min subtenis. Mi povus, falante, frakasi la kapon. Iam ci estis bona kamarado, sed de post la milito kaj la servado sub Korbulono ci iel sovaĝiĝis kaj mi cin malofte vidas.

Poste, silentinte dum momento, li diris:

— Kiel fartas tiu knabino ... tro mallarĝa en la koksoj ... kiun ci amis kaj kiun mi forprenis por ci de Aŭlo?

Vinicio konfuziĝis, sed Petronio sammomente rapidis lin helpi:

— Mi povas veti, sinjoro, — li diris, — ke li forgesis. Ĉu ci vidas lian konfuzon? Vinicioj estas bonaj soldatoj, sed ankoraŭ pli bonaj virkokoj. Ili bezonas inaron. Punu lin por tio, sinjoro, kaj ne invitu lin al la festeno, kiun Tigeleno promesas al ni aranĝi je cia honoro sur la Agripa lago.

— Ne, mi ne faros tion. Mi fidas al Tigeleno, ke tie ĝuste inaro ne forestos.

— Ĉu povus foresti ĥaritoj, kie estos Amoro? — respondis Tigeleno.

Sed Nerono diris:

— Enuo min turmentas! Laŭ la volo de la diino mi restis en Romo, sed mi ne povas tion elporti. Mi veturos Ancion. Mi sufokiĝas en ĉi tiuj malvastaj strataĉoj, meze de ĉi tiuj ruiniĝantaj domoj, meze de ĉi tiuj malpuraj anguloj. La malbonodora aero venas eĉ ĉi tien, en mian domon kaj en miajn ĝardenojn. Ha, se tertremo detruus Romon, se iu kolera dio samniveligus ĝin kun la tero, tiam mi montrus al vi, kiel oni devas konstrui la Urbon, kiu estas la kapo de la mondo kaj mia sidejo.

— Cezaro, — respondis Tigeleno, — ci diras: «se iu kolera dio detruus la Urbon» — ĉu jes?

— Jes. Kion do?

— Ĉu ci ne estas dio?

Nerono svingis la manon kun esprimo de enuo, poste li diris:

— Ni vidos, kion ci aranĝos al ni sur la Agripaj lagoj. Poste mi iros Ancion. Vi ĉiuj estas malgrandaj, do vi ne komprenas, ke al mi estas bezonaj grandaj aferoj.

Dirinte ĉi tion, li duonfermis la okulojn, komprenigante tiumaniere, ke li bezonas ripozon. Efektive la aŭgustanoj komencis disiri. Petronio eliris kun Vinicio kaj diris al tiu:

— Do ci estas vokita partopreni en la amuzo. La Ku-

probarba rezignis la vojaĝon, sed anstataŭ tio li diboĉos pli ol iam ajn, kaj mastrumaĉos en la Urbo, kiel en la propra domo. Do, ankaŭ ci penu trovi en tiuj diboĉoj distron kaj forgeson. Je diablo! Ni ja konkeris la mondon kaj ni rajtas amuziĝi. Ci, Marko, estas tre bela knabo, kaj parte al tio mi atribuas la simpation, kiun mi havas al ci. Je la efeza Diano! Se ci povus vidi ciajn kunkreskantajn brovojn kaj cian vizaĝon, en kiu oni sentas la malnovan sangon de la *kviritoj!* Ili, la aliaj, aspektas apud ci, kiel liberigitoj. Jes! Se tiu sovaĝa instruo ne malhelpus, Ligia estus hodiaŭ en cia domo. Penu pruvi al mi ankoraŭ, ke ili ne estas malamikoj de la vivo kaj de la homoj ... Ili traktis cin bone, do ci povas esti al ili danka, sed se mi estus en cia loko, mi malamegus tiun instruon kaj serĉus volupton tie, kie oni povas ĝin trovi. Ci estas belega knabo, mi ripetas, kaj Romo abundegas je eksedzinoj.

— Mi nur miras, ke ĉio tio cin ankoraŭ ne tedas? — respondis Vinicio.

— Kiu diris al ci tion? Min tio tedas jam delonge, sed mi ne havas cian aĝon. Mi cetere havas aliajn plaĉojn, kiuj mankas al ci. Mi ŝatas librojn, kiujn ci ne ŝatas, mi ŝatas poezion, kiu cin enuigas, mi ŝatas vazojn, gemojn kaj multajn aliajn objektojn, kiujn ci ne rigardas; mi havas ofte doloron en la sakro, kiun ci ne havas; fine mi trovis Eŭ-



nikon, kaj ci trovis nenium similan ... Mi sentas min kontenta hejme, meze de miaj ĉefverkoj, kaj cin mi neniam faros estetikulo. Mi scias, ke mi trovos en la vivo nenion pli ol tion, kion mi trovis, ci mem ne scias, ke ĉiam ci ankoraŭ esperas kaj serĉas. Se la morto venus al ci subite, malgraŭ cia tuta kuraĝo kaj malgraŭ ĉiuj malĝojoj ci mortus kun miro, ke jam ci devas forlasi la mondon; dum mi akceptus ĝin kiel nepraĵon, kun tiu konvinko, ke ne ekzistas en la mondo tiaj fruktoj, kiujn mi ne gustumis. Mi ne rapidas, sed mi ankaŭ ne tro malrapidos, mi nur klopodos, ke ĝis la fino ĉirkaŭu min gajeco. Ekzistas en la mondo gajaj skeptikuloj. La stoikistoj estas, laŭ mi, malsaĝaj, sed la stoikismo almenaŭ hardas la animojn, dum ciaz kristanoj enkondukas en la mondon malĝojon, kiu estas tio en la vivo, kio pluvo en la naturo. Ĉu ci scias, kion oni al mi diris? — nome, ke dum la solenaĵoj, kiujn Tigeleno aranĝos, ĉe la bordoj de la Agripa lago staros publikejoj, kaj en ili estos kolektitaj virinoj el plej eminentaj familioj de Romo. Ĉu troviĝos eĉ ne unu sufiĉe bela por cin konsoli? Estos tie ankaŭ virgulinoj, kiuj unuafoje prezentiĝos al la mondo ... kiel nimfoj. Tia estas nia Roma imperio ... Varme jam estas! La suda vento varmigos la akvon kaj ne pustuligos la nudajn korpojn. Kaj ci, Narciso, sciu, ke troviĝos eĉ ne unu virino, kiu cin rezistus, eĉ ne unu — eĉ se

ŝi estus vestalo.

Vinicio komencis bati la kapon per la mano, kiel homo okupata senĉese per unu penso.

— Jen la sorto, ke mi trafis ĝuste tiun solan...

— Kaj kiu kaŭzis tion, ĉu ne la kristanoj?... Sed la homoj, kies emblemo estas kruco, ne povas esti aliaj. Aŭskultu min: Grekujo estis belega kaj ĝi kreis la saĝecon de la mondo; ni kreis la potencon; kaj kiel ci pensas, kion povas krei tiu instruo? Se ci scias, klarigu al mi, ĉar, je Polukso, mi ne povas diveni tion.

Vinicio movis la ŝultrojn.

— Ci timas, ŝajne, ke mi iĝos kristano.

— Mi timas, ke ci fuŝos cian vivon. Se ci ne scias esti greko, estu romano, regu kaj ĝuu la vivon. Niaj ekscesaĵoj tial havas certan sencon, ke estas en ili ĝuste ĉi tiu ideo. La Kuprobarban mi malestimas, ĉar li estas arlekeno-greko. Se li konsiderus sin romano, mi konfesus, ke li estas prava, permesante al si la ekscesaĵojn. Promesu al mi, ke se nun, reveninte hejmen, ci trovos tie iun kristanon, ci montros al li la langon. Se tio estos Glaŭko la kuracisto, li eĉ ne ekmiros. Ĝis la revido sur la Agripa lago.

## Ĉapitro 31<sup>a</sup>

Pretorianoj ĉirkaŭis la boskojn kreskantajn ĉe la bordoj de la Agripa lago, por ke tro grandaj amasoj da gapuloj ne ĝenu la imperiestron kaj liajn gastojn; ĉar estis sciata, ke absolute ĉiu eminenta en Romo pro sia riĉo, saĝo aŭ belo partoprenos en tiu festeno, senprecedenca en la historio de la Urbo.

Tigeleno volis kompensi al Nerono la perditan vojaĝon en Aĥajon; superi ĉiujn, kiuj iam ajn gastigis Neronon; kaj pruvi al li, ke neniu scipovas lin tiel bone amuzi. Tiucele, estante ankoraŭ kun Nerono en Neapolo kaj poste en Benevento, li jam faris preparojn kaj dissendadis ordonojn, ke oni venigadu el la plej malproksimaj ekstremoj de la mondo bestojn, birdojn, maloftajn fiŝojn kaj kreskaĵojn, ne preterlasante vazojn kaj teksaĵojn, kiuj devis pli grandigi la brilon de la festeno. La plenumo de liaj ekscesaĵoj planoj kostis enspezojn el tutaj provincoj, sed pri tio la potenca favorato ne bezonis zorgi.

Lia influo kreskis de tago al tago. Tigeleno ankoraŭ ne estis al Nerono pli simpatia ol Petronio, sed li iĝadis ĉiam pli necesa. Petronio senfine superis lin per mondumeco, intelekto, sprito kaj sciis pli bone amuzi Neronon per konversacio; sed, je sia malfeliĉo, li superis per tio ankaŭ

la imperiestron mem, kio ekscitis ties ĵaluzon. Li ankaŭ ne scipovis esti ĉiam obeema instrumento kaj Nerono timis lian opinion, kiam estis koncernataj la aferoj de belgusto; dume kun Tigeleno li neniam sin sentis ĝenata. La titolo mem: *arbiter elegantiarum*, kiun oni donadis al Petronio, incitis la memamon de Nerono, ĉar kiu devus ĝin havi, ĉu ne li, la imperiestro? Tigeleno tamen havis tiom da prudento, ke li konsciis siajn mankojn; kaj vidante, ke li povas konkuri nek kun Petronio, nek kun Lukano, nek kun aliaj, kiujn distingis ĉu deveno, ĉu talentoj aŭ scio — li decidis eklipsi ilin per la subiĝeco de siaj servoj, kaj antaŭ ĉio per lukso tia, ke eĉ la imago de Nerono estu de ĝi frapita.

Li ordonis do pretigi la festenon sur grandega flosa konstruita el orumitaj traboj. Ĝiaj randoj estis ornamitaj per mirindaj konkaj el la Ruĝa maro kaj el la Hinda oceano, brilantaj per la koloroj de perloj kaj de ĉielarko. La flankoj estis kovritaj per tufoj da palmoj, per boskoj da lotosoj kaj plenflorantaj rozoj, inter kiuj oni kaŝis fontanojn, ŝprucigantajn aromaĵojn; statuojn de dioj; kaj orajn aŭ arĝentajn kaĝojn kun diverskoloraj birdoj. En la mezo altis grandega tendo — aŭ pli ĝuste, por ne ŝirmi la vidaĵon, nur tendosupro el siria purpuro, bazita sur arĝentaj kolonoj; kaj sube, kiel sunoj, brilis tabloj preparitaj por la

festenanoj kaj ŝarĝitaj je aleksandriaj vitraĵoj, kristaloj, per vazoj simple netakseblaj, rabitaj en Italujo, Grekujo kaj Anatolio. La flosa, pro la kreskaĵoj sur ĝi amasigitaj simila al insulo kaj ĝardeno, estis ligita per ŝnuroj oraj kaj purpuraj kun boatoj, havantaj la formojn de fiŝoj, cignoj, mevoj kaj fenikopteroj, en kiuj ĉe koloraj remiloj sidis nudaj remistoj kaj remistinoj kun mirinde belaj formoj kaj vizaĝoj, kun haroj frizitaj laŭ la orienta maniero, aŭ plektitaj sub oraj retoj. Kiam Nerono, alveninte kun Popea kaj la aŭgustanoj, surpaŝis la ĉefan floson kaj sidiĝis sub la purpura tendo, la boatoj ekmoviĝis, la remiloj komencis bati la akvon, streĉiĝis la oraj ŝnuroj kaj la flosa kun la festeno kaj la gastoj komencis movi sin kaj rondnaĝi sur la lago. Ĉirkaŭe viciĝis aliaj boatoj kaj malgrandaj flosoj, plenaj je citristinoj kaj harpistinoj, kies rozkoloraj korpoj, bildantaj sin sur la bluo de la ĉielo kaj de la akvo kaj rebrilantaj de la oraj instrumentoj, ŝajnis sorbi en sin tiun bluan kaj tiujn brilojn, koloriĝi kaj flori, kiel rozoj.

Ankaŭ el la apudbordaj boskoj, el strangaj konstruaĵoj, speciale starigitaj kaj kaŝitaj en la densaĵo, aŭdiĝis la sonoj de muziko kaj kanto. Resonis la ĉirkaŭaĵo, resonis la boskoj, eĥoj disportis la tonojn de kornoj kaj trumpetoj. Nerono mem, havante unuflanke Popean, aliflanke Pi-

tagoron, admiris kaj, precipe kiam inter la boatoj aperis junaj sklavinoj alivestitaj kiel sirenoj kovritaj per verdaj retoj, imitantaj skvamaron, li ne avaris laŭdojn al Tigeleono. Li rigardadis tamen, laŭ sia kutimo, al Petronio, volante ekkoni la opinion de la «arbitro»; tiu tamen sin tenis indiferece kaj nur, rekte demandite, respondis:

— Mi opinias, sinjoro, ke dek mil nudaj knabinoj impresas malpli ol unu.

Al Nerono tamen plaĉis la *flosanta festeno*, ĉar ĝi estis io nova. Oni servis cetere, kiel kutime, tiel eksterordinarajn manĝaĵojn, ke eĉ la imago de Apicio svenus je ilia vido, kaj vinojn en tiom da specoj, ke Otono, ĉe kiu oni servadis da ili okdek, sin kaŝus sub la akvon pro honto, se li povus vidi tiun lukson. Al la tablo, krom virinoj, sidiĝis ekskluzive aŭgustanoj, inter kiuj Vinicio eklipsis ĉiujn per sia beleco. Iam liaj figuro kaj vizaĝo konigis profesion soldaton, nun la internaj zorgoj kaj la fizika doloro kiun li suferis, tiel ĉizis liajn trajtojn, kvazaŭ tuŝus ilin la delikata mano de majstra skulptisto. Lia vizaĝo perdis la iaman brunecon, restis al ĝi tamen la oraj nuancoj de la numida marmoro. La okuloj iĝis pli grandaj, pli malgajaj. Nur lia torso konservis la iaman potencon formon, kvazaŭ kreita por kiraso, sed super tiu torso de legiano levis sin kapo de greka dio, aŭ almenaŭ de rafinita patricio, kune subtila

kaj grandioza. Petronio, dirante al li, ke neniu aŭgustanio povus nek volus al li rezisti, parolis kiel spertulo. Efektive ili rigardis lin ĉiuj, ne esceptante Popean kaj la vestalon Rubrian, kiu ĉeestis la festenon laŭ la deziro de la imperiestro.

Vinoj, glaciigitaj en neĝoj de montsuproj, baldaŭ varmigis la korojn kaj la kapojn de la festenanoj. El la apudborda densaĵo eliĝadis ĉiam novaj boatoj, havantaj la formojn de cikadoj kaj libeloj. La blua spegulo de la lago aspektis kvazaŭ iu surŝutus ĝin per florpetaloj aŭ kvazaŭ ĝin kovrus amaso da papilioj. Super la boatoj tie kaj ie levis sin kolomboj kaj aliaj birdoj el Hindujo kaj Afriko, alligitaj per arĝentaj kaj bluaj fadenoj aŭ ŝnuretoj. La suno jam estis trakurinta la pli grandan parton de la ĉielo, sed la tago, kvankam la festeno okazis en la komenco de majo, estis varma, eĉ brulanta. La lago balancis sin de la frapoj de la remiloj, kiuj batis la ondaron samtakte kun la muziko, sed en la aero ne spiris eĉ plej facila vento kaj la boskoj staris senmove, kvazaŭ ili aŭskultus kaj rigardus sorĉite tion, kio okazis sur la akvo. La floso rondnaĝis senĉese sur la lago, portante ĉiam pli ebriajn kaj pli bruantajn festenanojn. La festeno ne atingis ankoraŭ la mezon, kiam oni ne plu gardis la ordon, en kiu ĉiuj sidiĝis al la tablo. Nerono mem donis la ekzemplon, ĉar leviĝinte,

li ordonis al Vinicio, kiu kuŝis apud la vestalo Rubria, cedi la lokon, kaj, okupinte lian triklinion, li komencis ion flustri en ŝian orelon. Vinicio troviĝis apud Popea, kiu post momento etendis al li la brakon, petante, ke li rebuku ŝian malfiksiĝintan brakringon, kaj kiam li faris tion per iom tremantaj manoj, ŝi ĵetis al li el sub la longaj okulharoj rigardon kvazaŭ honteman kaj skuis sian oran kapon, ŝajne ion neante. Dume la suno iĝis pli granda, pli ruĝa kaj rulis malrapide trans la pintojn de la boskoj; la gastoj estis jam plejparte tute ebriaj. La floso naĝis nun proksime al la bordoj, sur kiuj, meze de aroj da arboj kaj floroj, oni vidis grupojn da homoj, alivestitaj kiel faŭnoj aŭ satirusoj, ludantaj flutojn, ŝalmojn, tamburetojn, kaj grupojn da knabinoj prezentantaj nimfojn, driadojn kaj hamadriadojn. La krepusko venis fine meze de ebriaj ek-krioj je la gloro de Luno, sonantaj el sub la tendo: tiam la boskoj eklumis per miloj da lampoj. El la publikejoj, starantaj ĉe la bordoj, ekfluis torentoj da lumo: sur la terasoj aperis novaj grupoj, ankaŭ nudaj, konsistantaj el edzinoj kaj filinoj de plej eminentaj romanaj familioj. Per la voĉo kaj per malmodestaj gestoj ili komencis voki la festenanojn. La floso fine albordiĝis, Nerono kaj la aŭgustanoj sin ĵetis en la boskojn, diskuris en la publikejojn, en tendojn, kaŝitajn meze de la densaĵoj, en artefaritajn grotojn meze



de fontoj kaj fontanoj. Frenezo ekregis ĉiujn; neniu sciis, kie perdiĝis la imperiestro, kiu estas senatano, kiu kavaliro, kiu akrobato aŭ muzikisto. La satirusoj kaj faŭnoj komencis postkuri la nimfojn. Oni batis per tirsoj la lampojn por ilin estingi. Kelkajn partojn de la boskoj ekregis mal-lumo. Ĉie tamen oni aŭdis jen laŭtajn kriojn, jen ridojn, jen flustrojn, jen ekscitan spiradon de homaj brustoj. Romo efektive vidis ĝis tiam nenion similan.

Vinicio ne estis malsobra, kiel dum tiu festeno en la imperiestra palaco, kiun Ligia ĉeestis, sed ankaŭ lin en-sorĉis kaj ebriigis la vido de ĉio, kio okazis, kaj fine kaptis lin avido je volupto. Ĵetinte sin en la arbaron, li kuris kun la aliaj, serĉante, kiu el la driadoj ŝajnos al li plej bela. Ĉiumomente novaj aroj da ili, kantante kaj kriante, kuris preter li, pelate de faŭnoj, satirusoj, senatanoj, kavaliroj kaj de resonoj de la muziko. Ekvidinte fine aron da knabinoj, kondukatan de unu, alivestita kiel Diano, li eksaltis al ili, volante rigardi de pli proksime la diinon, kaj subite la koro haltis en lia brusto. Ĉar ekŝajnis al li, ke en la diino, kronita per luno, li rekonas Ligian.

Ili dume ekĉirkaŭis lin per freneza dancrondo, kaj post momento, volante lin videble instigi al persekuto, diskuris, kiel aro da kapreolinoj. Sed li restis loke, kun bantanta koro, sen spiro, ĉar kvankam li ekkonis, ke la Diano

ne estis Ligia kaj de proksime eĉ ŝin ne similis, la tro forta impresado senigis lin je la fortoj. Subite ekregis lin sopiro je Ligia, sopiro tiel senlima, kian li spertis neniam en la vivo, kaj la amo al ŝi ekfluis per nova, grandega ondo en lian bruston. Neniam ŝi ŝajnis al li pli kara, pli ĉasta kaj pli adorinda ol en tiu ĉi arbaro de diboĉo kaj de freneza malĉasto. Antaŭ momento li mem volis trinki el ĉi tiu pokalo kaj partopreni tiun ĉi orgion de volupto kaj senhonto, nun kaptis lin malplaĉo kaj abomeno. Li eksentis, ke lin sufokas abomeno, ke lia brusto bezonas aeron kaj la okuloj stelojn, ne vualitajn de la densaĵo de tiu terura arbaro, kaj li decidis forkuri. Sed apenaŭ li ekiris, ekstaris antaŭ li virina figuro kun kapo ĉirkaŭvolvita per vualo, kaj, apoginte la manojn sur liaj ŝultroj, komencis flustri, ĉirkaŭverŝante per varmega spiro lian vizaĝon:

— Mi amas cin!... Venu! Neniu nin vidos, rapidu!

Vinicio vekigis, kvazaŭ el dormo:

— Kiu ci estas?

Sed ŝi apogis sin sur li per la brusto kaj komencis insisti:

— Rapidu! Rigardu, solece estas ĉirkaŭe, kaj mi cin amas! Venu!

— Kiu ci estas? — ripetis Vinicio.

— Divenu!...

Dirinte ĉi tion, ŝi alpremis tra la vualo la buŝon al lia buŝo, tirante al si samtempe lian kapon, ĝis fine, kiam ekmankis al ŝi la spiro, ŝi detiris de li la vizaĝon.

— La nokto de amo! La nokto de volupto! — ŝi parolis, rapide kaptante la aeron. — Hodiaŭ estas permesite!... Prenu min!

Sed tiu kiso brulvundis Vinicion kaj inspiris al li novan abomenon. Lia animo kaj koro estis for kaj en la tuta mondo ekzistis por li neniu, krom Ligia.

Do, forŝovinte per la mano la vualitino, li diris:

— Kiu ajn ci estas, mi amas alian kaj mi ne volas cin.

Tiam ŝi mallevis al li la kapon:

— Levu la vualon ... Sed en la sama momento ekbruetis la folioj de proksimaj mirtoj; la vualitino malaperis, kiel songa bildo, nur de malproksime aŭdiĝis ŝia rido, iel stranga kaj malbonaŭgura.

Petronio ekstaris antaŭ Vinicio.

— Mi aŭdis kaj vidis, — li diris.

Kaj Vinicio respondis:

— Ni iru for!...

Ili foriris. Ili preterpasis la brile lumigitajn publikejojn, la boskon, vicon de surĉevalaj pretorianoj kaj retrovis la portilojn.

— Mi kuniros al ci, — diris Petronio.

Kaj ili sidiĝis kune. Sed envoie ambaŭ silentis. Nur kiam ili troviĝis en la domo de Vinicio, en la atrio, Petronio diris:

— Ĉu ci scias, kiu ŝi estis?

— Rubria? — demandis Vinicio, ekstremente pro la nura penso, ke Rubria estis vestalo.

— Ne.

— Do kiu?

— La fajro de Vesto estas malsanktigita, ĉar Rubria estis kun la imperiestro. Sed kun ci parolis...

Kaj li finis ankoraŭ pli mallaŭte:

— La dia aŭgustino.

Sekvis momento da silento.

— Nerono, — diris Petronio, — ne sciis kaŝi de ŝi sian pasion al Rubria, do ŝi volis eble venĝi, kaj mi ŝin malhelpis — ĉar se ci, rekoninte la aŭgustinon, al ŝi rifuzus, ci estus nerevokeble perdita: ci, Ligia, kaj eble ankaŭ mi.

Sed Vinicio eksplodis:

— Mi havas jam sufiĉe! Tedas min jam Romo, la imperiestro, la festenoj, la aŭgustino, Tigeleno kaj vi ĉiuj! Mi sufokiĝas! Mi ne povas tiel vivi! Mi ne povas! Ĉu ci komprenas?

— Ci perdas la prudenton, juĝon, mezuron!... Ho, Vinicio!

— Mi amas ŝin solan en la mondo!

— Kio do?

— Do mi ne volas alian amon, mi ne volas vian vivon, viajn festenojn, vian senhonton kaj viajn krimojn!

— Kio al ci okazas? Ĉu ci estas kristano?

La juna viro ĉirkaŭprenis la kapon per la manoj kaj komencis ripeti, kvazaŭ en malespero:

— Ankoraŭ ne! Ankoraŭ ne!

## Ĉapitro 32<sup>a</sup>

Petronio foriris hejmen, movante la ŝultrojn kaj tre malkontenta. Nun ankaŭ li rimarkis, ke li kaj Vinicio ĉesis kompreni sin reciproke kaj ke iliaj animoj tute disiĝis. Iam Petronio havis grandegan influon je la juna soldato. Li estis en ĉio lia modelo kaj ofte kelkaj liaj ironiaj vortoj sufiĉis por Vinicion de io deturni aŭ al io instigi. Nun restis el tiu influo nenio, tiagrade, ke Petronio ne provis eĉ la antaŭajn rimedojn, sentante, ke lia spriteco kaj ironio deglitos senefike de la novaj tavoloj, kiujn sur la animon de Vinicio metis la amo kaj konatiĝo kun la nekomprenebla kristana mondo. La sperta skeptikulo komprenis, ke li perdis la ŝlosilon al tiu animo. Tio inspiris al li malkontenton kaj eĉ timon, kiun ankoraŭ plifortigis la okazoj de la lasta nokto.

«Se flanke de la aŭgustino tio estas ne pasema deziro, sed pli daŭra pasio, — pensis Petronio, — tiam okazos unu el la du: aŭ Vinicio ŝin ne rezistos kaj povos pereji pro iu ajn incidento, aŭ, kio nun estas pli pli kredebla, li rezistos; tiuokaze li sendube pereos, kaj kun li eble ankaŭ mi, almenaŭ tial, ke mi estas lia parenco kaj ke la aŭgustino, direktinte sian malamikecon al la tuta familio, transĵetos sian influon sur la pesilteleron de Tigeleno.»

Kaj tiel estis malbone, kaj alie. Petronio estis homo kuraĝa kaj ne timis la morton, tamen, atendante de ĝi nenion, li ne volis ĝin elvoki. Post longa pripenso li decidis fine, ke plej bone kaj plej sendanĝere estos vojaĝigi Vinicion for el Romo. Ha! Se li povus krome doni al li Ligian kiel vojaĝan donacon, li farus tion kun plezuro. Sed eĉ sentio li esperis, ke ne estos al li tre malfacile inklinigi Vinicion al forveturo. Tiam li diskonigus sur Palatino famon pri malsano de Vinicio kaj forturnus la danĝeron tiel de li, kiel de si mem. La aŭgustino finfine ne sciis, ĉu ŝi estis rekonita de Vinicio; ŝi povis supozi, ke ne, do ŝia memamo ĝis nun ne multe suferis. Alie povus tamen okazi en la estonteco, kaj kontraŭ tio oni devis antaŭagi. Petronio deziris antaŭ ĉio ĝisatendi pli konvenan tempon, ĉar li komprenis, ke se Nerono foje iros Grekujon, tiam Tigeleno, kiu el la aferoj de la arto komprenis nenion, troviĝos sur

la dua plano kaj perdos sian influon. En Grekujo Petronio estis certa pri venko kontraŭ ĉiuj rivaloj.

Dume li decidis atenti Vinicion kaj inklinigi tiun al vojaĝo. Dum dekelkaj tagoj li eĉ pensis pri tio, ke se li havigus de la imperiestro edikton, ekzilantan la kristanojn el Romo, Ligia forlasus ĝin kune kun la aliaj konfesantoj de Kristo, kaj Ligian sekvus Vinicio. Tiam persvadoj ne estus por li bezonaj. Ja antaŭ ne tre longa tempo, kiam la judoj komencis tumulto pro malamo kontraŭ la kristanoj, la imperiestro Klaŭdio, ne sciante distingi la unuajn de la aliaj, ekzilis la judojn. Kial do Nerono ne ekzilu la kristanojn? Estus pli da loko en Romo. Petronio post tiu «flosanta festeno» vidadis ĉiutage Neronon sur Palatino kaj en aliaj domoj. Sugesti al li similan penson estus facile, ĉar Nerono neniam kontraŭstaris al persvadoj, kaŭzantaj al iu pereon aŭ malutilon. Post matura pripenso Petronio pretigis en la kapo la tutan planon. Nome, li aranĝos ĉe si festenon kaj dum tiu festeno li inklinigos la imperiestron eldoni la edikton. Li eĉ esperis, ke sendube al li la imperiestro konfidus la plenumon. Tiam li foririgus Ligian kun ĉiuj konsideroj, ŝuldataj al la amatino de Vinicio, ekzemple en Bajon, kaj tie ili amu unu la alian kaj amuzu sin per la kristanismo, kiom plaĉos al ili.

Dume li vizitadis Vinicion ofte, unue tial, ke malgraŭ

la tuta romana egoismo li ne povis seniĝi de amo al li, due, por inklinigi lin forvojaĝi. Vinicio ŝajnis sin malsana kaj ne montriĝis sur Palatino, kie naskiĝadis ĉiutage aliaj projektoj. Unu tagon fine Petronio ekaŭdis el la buŝo de Nerono mem, ke li nepre veturos post tri tagoj Ancion, kaj sekvatage li iris sciigi tion al Vinicio.

Sed tiu montris al li liston de personoj, invititaj en Ancion, kiun matene alportis al li liberigito de la imperiestro.

— Estas sur ĝi mia nomo, — li diris, — kaj estas ankaŭ la cia. Reveninte, ci trovos hejme saman liston.

— Se mi ne estus inter la invititoj, — respondis Petronio, — tio signifus, ke mi devas morti, kaj mi ne supozas, ke tio okazos antaŭ la vojaĝo en Aĥajon. Tie mi estos tro bezona al Nerono.

Poste, trarigardinte la liston, li diris:

— Apenaŭ ni revenis Romon, ni ĝin devas denove forlasi kaj treni nin en Ancion. Sed ni devas, ĉar tio estas ne nur invito sed kune ordono.

— Kaj se iu ne obeus?

— Li ricevus alispecan vokon: ke li iru vojaĝon multe pli longan, tiun, de kiu oni ne revenas. Kiel domaĝe, ke ci ne obeis mian konsilon kaj ne forveturis, dum estis ankoraŭ tempo. Nun ci devas iri Ancion.



— Nun mi devas iri Ancion ... Rigardu, en kia tempo ni vivas kaj kiaj malnoblaj sklavoj ni estas.

— Ĉu ci tion nur hodiaŭ rimarkis?

— Ne, sed vidu, ci argumentis, ke la kristana instruo estas malamiko de la vivo, ĉar ĝi metas sur ĝin katenojn. Sed ĉu povas esti katenoj pli pezaj ol tiuj, kiujn ni portas? Ci diris: Grekujo kreis la saĝecon kaj belecon kaj Romo la potencon. Kie estas nia potenco?

— Voku al ci Ĥilonon. Filozofado tute ne logas min hodiaŭ. Je Herkulo! Ne mi kreis tiun ĉi tempon kaj ne mi respondas por ĝi. Ni parolu pri Ancio. Sciu, ke tie atendas cin granda danĝero kaj ke pli bone estus eble por ci provi cialajn fortojn kontraŭ tiu Urso, kiu sufokis Krotonon ol tien iri, tamen ci ne povas ne iri.

Vinicio senzorge svingis la manon kaj diris:

— Danĝero! Ni ĉiuj vadas en la mallumo de morto, kaj ĉiumomente alia kapo profundiĝas en tiun mallumon.

— Ĉu mi nomu al ci ĉiujn, kiuj havis iom da prudento kaj tial, malgraŭ la tempoj de Tiberio, Kaligulo, Klaŭdio kaj Nerono ĝisvivis la aĝon de okdek aŭ naŭdek jaroj? Servu al ci kiel ekzemplo jen tiu Domicio Afro. Li maljuniĝis trankvile, kvankam dum la tuta vivo li estis ŝtelisto kaj kanajlo.

— Eble tial! Eble ĝuste tial! — respondis Vinicio. Poste

li komencis trarigardi la liston kaj diris:

— Tigeleno, Vatinio, Seksto Afrikano, Akvilio Regulo, Svelio Neruleno, Eprio Marcelo kaj tiel plu! Kia kolekto da sentaŭguloj kaj friponoj! Kaj oni pensu nur, ke ĝi regas la mondon! Ĉu ne pli konvenus al ili portadi tra urbetoj iun egiptan aŭ sirian idolon, muzikaĉi per sistroj kaj perlabori la panon per aŭgurado aŭ ŝnursaltado?

— Aŭ prezentadi dresitajn simiojn, kalkulantajn hundojn, aŭ azenon, blovantan en fluton, — aldonis Petro. — Ĉio tio estas vera, sed ni parolu pri io pli grava. Streĉu cian atenton kaj aŭskultu min: mi rakontis sur Palatino, ke ci estas malsana kaj ne povas forlasi la domon, dume cia nomo troviĝas tamen sur la listo, kio pruvas, ke iu ne kredis miajn rakontojn kaj speciale zorgis pri cia invito. Por Nerono tio estas tute indiferenta, ĉar ci estas por li soldato, kun kiu oni povas babili eventuale pri cirkaj vetkuroj, sed kiu pri la poezio kaj muziko havas nenian ideon. La figurigon de cia nomo sur la listo prizorgis do verŝajne Popea, kaj tio signifas, ke ŝia pasio al ci ne estis pasema ekdeziro, kaj ke ŝi volas cin konkeri.

— Kuraĝa aŭgustino ŝi estas!

— Kuraĝa, vere, ĉar ŝi povas sin pereigi nesaveble. Inspiru al ŝi Venero plej baldaŭ alian amon, sed kiel longe ŝi deziras cin, ci devas agi kun ĉia singardo. Al la Kuprobar-

ba ŝi jam komencas esti indiferenta; li preferas nun jam Rubrian aŭ Pitagoron, sed pro la nura memamo li venĝus kontraŭ vi ambaŭ plej terure.

— En la bosko mi ne sciis, ke al mi parolas la aŭgustino, sed ci ja subaŭskultis kaj ci scias, kion mi respondis al ŝi: ke mi amas alian kaj ke mi ŝin ne volas.

— Kaj mi admonas cin je ĉiuj subteraj dioj, ne perdu tiun reston de la prudento, kiun la kristanoj lasis al ci. Kiel oni povas heziti, havante elekton inter pereco verŝajna kaj certa? Ĉu mi ne diris jam al ci, ke se ci vundus la memamon de la aŭgustino, ci estus perdita nesaveble? Je Hadeso! Se la vivo cin tedas, prefere tuj distranĉu ciajn vejnojn aŭ ĵetu cin sur glavon, ĉar se ci ofendos Popean, povas cin trafi morto malpli facila. Iam estis pli agrable paroli kun ci! Kio ĝuste cin ĝenas? Ĉu ci ion perdos pro tio? Ĉu ĝi malhelpos al ci ami cian Ligian? Memoru, krome, ke Popea vidis ŝin sur Palatino kaj ne estos al ŝi malfacile diveni, pro kiu ci rifuzas tiel altan favoron. Kaj tiam ŝi retrovos Ligian, eĉ sub la tero. Ci pereigos ne nur cin mem, sed ankaŭ Ligian — ĉu ci komprenas?

Vinicio aŭskultis, kvazaŭ pensante pri io alia, fine li diris:

- Mi devas ŝin vidi.
- Kiun? Ligian?

— Ligian.

— Ĉu ci scias, kie ŝi estas?

— Ne.

— Do ci komencos ree serĉi ŝin en malnovaj tombejoj kaj en Transtibero?

— Mi ne scias, sed mi devas ŝin vidi.

— Bone. Kvankam ŝi estas kristanino, montriĝos eble, ke ŝi estas pli prudenta ol ci, kaj montriĝos sendube, se ŝi ne volas cian pereon.

Vinicio movis la ŝultrojn.

— Ŝi savis min el la manoj de Urso.

— Tiuokaze rapidu, ĉar la Kuprobarba ne prokrastos la forveturon. Mortverdiktojn li povas eldoni ankaŭ el Ancio.

Sed Vinicio ne aŭskultis. Okupis lin unu sola penso: vidi Ligian, do li komencis mediti pri la rimedoj.

Dume okazis cirkonstanco, kiu povis forigi ĉiujn malfacilaĵojn. Nome, la sekvantan tagon neatendite venis al li Ĥilono.

Li venis mizera kaj ĉifonvestita, kun signoj de malsato sur la vizaĝo, en disŝirita vestaĉo, tamen la servistoj, al kiuj antaŭe estis ordonite enlasi lin je ĉiu horo de tago kaj nokto, ne kuraĝis lin reteni, tiel ke li iris rekte en la atrion kaj, ekstarinte antaŭ Vinicio, diris:

— La dioj donu al ci senmortecon kaj dividu kun ci la regadon de la mondo.

Vinicio en la unua momento sentis la deziron ordoni puŝi lin ekster la pordon. Sed venis al li la penso, ke eble la greko scias ion pri Ligia, kaj la scivolo venkis la abomenon.

— Ĉu estas ci? — li demandis. — Kio okazas al ci?

— Malbona estas mia sorto, filo de Jovo, — respondis Ĥilono. — La vera virto estas komercaĵo, pri kiu neniu hodiaŭ demandas, kaj vera saĝulo devas esti kontenta eĉ pro tio, se unufoje en kvin tagoj li havas sufiĉe da mono por aĉeti ĉe buĉisto ŝafan kapon, kiun li ĉirkaŭmordas en mansardo, trinketante ĉe tio siajn larmojn. Ha, sinjoro! Ĉion, kion ci al mi donis, mi elspezis por libroj ĉe Atrakto, kaj poste oni min priŝtelis, ruinigis; la sklavino, kiu devis skribi mian scion, forkuris, kunprenante la reston de tio, per kio min favoris cia malavareco. Mizera mi estas, sed mi ekpensis: al kiu mi iru, se ne al ci, Serapo, kiun mi amas, adoras kaj por kiu mi riskis la vivon?

— Por kio ci venas kaj kion ci alportas?

— Mi venas por helpo, Baalo, kaj mi alportas al ci mian mizeron, miajn larmojn, mian amon kaj fine informojn, kiujn mi kolektis pro amo al ci. Ĉu ci memoras, sinjoro, kion mi diris al ci antaŭ certa tempo, ke mi vendis al

la sklavino de la dia Petronio unu fadenon el la zoneto de Venero el Pafoso?... Mi informiĝis, ĉu tio helpis al ŝi, kaj ci, filo de Suno, kiu scias, kio okazas en la domo de Petro-nio, scias ankaŭ, kio estas tie Eŭniko. Mi havas ankoraŭ unu tian fadenon. Mi ĝin konservis por ci, sinjoro.

Ĉi-momente li interrompis, rimarkinte koleron, ŝvelantan en la brovoj de Vinicio, kaj, volante antaŭi la eksplodon, li diris rapide:

— Mi scias, kie loĝas la dia Ligia, mi montros al ci, sinjoro, la domon kaj la strateton.

Vinicio subpremis la emocion, kiun kaŭzis al li ĉi tiu novaĵo, kaj diris:

— Kie ŝi estas?

— Ĉe Lino, maljuna kristana pastro. Ŝi estas ĉe li kune kun Urso, kaj tiu ĉi, kiel antaŭe, laboras ĉe la muelisto, kiu nomas sin, kiel cia intendanto, sinjoro, Demaso... Jes, Demaso!... Urso laboras nokte, do, ĉirkaŭiginte nokte la domon, oni lin ne renkontos ... Lino estas maljuna ... kaj hejme, krom ili, estas ankoraŭ nur du aĝaj virinoj.

— De kie ci scias ĉion tion?

— Ci memoras, sinjoro, ke la kristanoj havis min en siaj manoj kaj ... indulgis min. Glaŭko eraras, vere, opiniante ke mi estas la kaŭzo de liaj malfeliĉoj, sed li ekkredis tion, kompatindulo, kaj kredas ĝis nun — tamen ili min

indulgis! Ne miru do, sinjoro, ke dankemo plenigis mian koron. Mi estas homo el la malnovaj, pli bonaj tempoj. Mi do pensis: ĉu mi forgesu miajn amikojn kaj bonfarintojn? Ĉu mi ne estus ŝtonkora, se mi ne demandus pri ili, ne informiĝus, kio al ili okazas, kiel ili fartas kaj kie ili loĝas? Je la Cibelo Pesinunta<sup>246</sup>! Ne mi estas kapabla al tio. Komence detenadis min la timo, ke ili povus miskompreni miajn intencojn. Sed la amo, kiun mi havas al ili, montriĝis pli granda ol la timo, kaj precipe kuraĝigis min tiu ilia facileco en pardonado de ĉiuj malbonagoj. Antaŭ ĉio mi tamen pensis pri ci, sinjoro. Nia lasta militiro finiĝis malvenke, kaj ĉu tia filo de Fortuno povas paciĝi kun tiu ĉi penso? Do mi preparis por ci venkon. La domo staras aparte. Ci povas ordoni al ciaj sklavoj ĉirkaŭigi ĝin tiel, ke eĉ muso el ĝi ne forŝteliĝu. Ho sinjoro, sinjoro! De ci sola dependas, ke ankoraŭ la hodiaŭan nokton tiu grandanima reĝidino troviĝu en cia domo. Sed se tio okazos, pensu, ke kunhelpis tion la tre malriĉa kaj malsata filo de mia patro.

La sango alfluis en la kapon de Vinicio. La tento refoje ekskuis lian tutan estaĵon. Jes! Tio estis rimedo, kaj ĉi-foje tute certa. Se li foje havos Ligian ĉe si, kiu kapablos ŝin de li forpreni? Se li foje igos Ligian sia amatino, kion alian ŝi

<sup>246</sup> **Pesinunta** (lat. *Pessinuntica*) — nomepiteto de Cibelo (vd la noton [93]), laŭ la templo de la diino en la (ne plu ekzistanta) Anatolia urbo Pesinunto (lat. *Pessinus* ← gr. Πεσσινοῦς).

povos fari ol resti lia amatino por ĉiam? Kaj pereu tiam ĉiuj instruoj! Kion tiam signifos por li la kristanoj kun sia kompatemo kaj malserena kredo? Ĉu ne estas tempo forskui de si ĉion tion? Ĉu ne estas tempo komenci vivi, kiel ĉiuj vivas? Kion poste faros Ligia, kiel ŝi akordigos sian sorton kun la instruo, kiun ŝi konfesas, ankaŭ tio estas malpli grava. Tiuj aferoj ne gravas! Antaŭe ŝi estos lia, kaj ŝi estos lia eĉ jam hodiaŭ. Kaj ankaŭ tio estas demando — ĉu ŝia animo persistos ĉe tiu instruo kontraŭ tiu mondo nova por ŝi, kontraŭ la volupto kaj ekstazoj, al kiuj ŝi devos subiĝi? Kaj ĝi povas okazi jam en tiu ĉi nokto. Sufiĉas reteni Ĥilonon kaj doni je la krepusko la ordonojn. Kaj poste — ĝojo sen fino!

«Kio estis mia vivo? — pensis Vinicio, — suferado, nesatigita pasio kaj farado de senĉesaj demandoj al mi mem — sen respondoj.» Tiel ĉio estos tranĉita kaj finita. Li rememoris vere, ke li promesis al ŝi ne levi kontraŭ ŝin la manon. Sed je kio li ĵuris? Ne je la dioj, ĉar li ne plu kredis je ili, ne je Kristo, ĉar je Kristo li ankoraŭ ne kredis. Cetere, se ŝi sentos sin ofendita, li ŝin al si edzinigos kaj tiel rekompencos al ŝi la ofendon. Jes, al tio li sentas sin devigita, ĉar li ja ŝuldas al ŝi la vivon.

Ĉe tio li rememoris la tagon, en kiu li enfalis kun Krotono en ŝian rifuĝejon; li rememoris la levitan super si



pugnegon de Urso kaj ĉion, kio sekvis poste. Li ekvidis ŝin denove, klinitan super lia lito, vestitan per sklavina vesto, belegan, kiel diino, bonfaran kaj adoratan. Liaj okuloj malgraŭvole direktiĝis al la lararejo kaj al tiu kruceto, kiun ŝi lasis al li, forirante. Ĉu ĉion tion li repagos al ŝi per nova atenco? Ĉu li trenos ŝin je la haroj en la dormoĉambron, kiel sklavinon? Kaj kiel li scios tion fari, se li ne nur avidas, sed ankaŭ amas ŝin, kaj li amas ŝin ĝuste pro tio, ke ŝi estas tia, kia ŝi estas? Kaj subite li eksentis, ke ne sufiĉos al li havi ŝin en sia hejmo, ne sufiĉos kapti ŝin perforte en la brakojn, kaj ke lia amo jam volas ion pli, nome ŝian konsenton, ŝian amon kaj ŝian animon. Benita estos ĉi tiu tegmento, se ŝi venos sub ĝin propravole, benita estos tiu momento, benita la tago, benita la vivo. Tiam la feliĉo de ili ambaŭ estos kiel senlima maro kaj kiel la suno. Sed forkapti ŝin perforte signifus mortigi por ĉiam tian feliĉon, kaj kune detrui, malpurigi kaj malsanktigi tion, kio estas la plej kara kaj sole amata en lia vivo.

Teruro traigis lin nun je la nura penso pri tio. Li turnis la okulojn al Ĥilono, kiu, rigardante lin, ŝovis la manon sub sian vestaĉon kaj gratis sin maltrankvile; poste traigis lin neesprimebla abomeno kaj deziro piedpremi tiun iaman helpanton, kiel oni piedpremas fian vermon aŭ venenan serpenton. Post momento li jam sciis, kion li devas fa-

ri. Sed, konante en nenio mezuron kaj sekvante la impulson de sia severa romana naturo, li sin turnis al Ĥilono kaj diris:

— Mi ne faros tion, kion ci al mi konsilas, por ke ci tamen ne foriru sen rekompenco, kiun ci meritas, mi ordonos doni al ci tricent batojn en la punĉambro.

Ĥilono paliĝis. En la bela vizaĝo de Vinicio estis tiom da malvarma kolero, ke li ne povis eĉ momente esperi, ke la promesita rekompenco estis nur kruela ŝerco.

Do li ĵetis sin en unu momento sur la genuojn kaj fleksiĝinte, komencis ĝemi per interrompata voĉo:

— Kiel do, persa reĝo? Pro kio? Piramido da indulgo! Koloso da kompatemo! Pro kio?... Mi estas maljuna, malsata, mizera ... Mi servis cin ... Tiel ci repagas al mi?

— Kiel ci al la kristanoj, — respondis Vinicio.

Kaj li vokis sian intendanton.

Sed Ĥilono saltis al liaj piedoj kaj, ĉirkaŭpreninte ilin konvulsie, vokis ankoraŭ kun vizaĝo, kovrita de morta paleco:

— Sinjoro, sinjoro!... Mi estas maljuna! Kvindek, ne tricent ... Kvindek sufiĉos! Cent, ne tricent ... Kompatu! Kompatu!

Vinicio forpuŝis lin per la piedo kaj eldiris la ordonon. En unu sekundo post la intendanto eniris du fortaj kvad-

oj, kiuj, kaptinte Ĥilonon je la restaĵo de liaj haroj, volvis ĉirkaŭ lia kapo lian propran mantelaĉon kaj ekprenis lin en la punĉambron.

— En la nomo de Kristo!... — ekkriis la greko en la pordo de la koridoro.

Vinicio restis sola. La eldonita ordono stimulus kaj vigligis lin. Dume li penis kolekti la diskutintajn pensojn kaj reordigi ilin. Li sentis grandan malpliigon de sia premiteco kaj la venko, kiun li atingis kontraŭ si mem, plengigis lin per espero. Ŝajnis al li, ke li faris ian grandan paŝon al Ligia kaj ke devas lin trafi por tio ia rekompenco. En la unua momento ne venis al li eĉ la penso, kiel grandan maljustaĵon li faris al Ĥilono, kaj ke li ordonis lin skurĝi pro la samo, pro kio li antaŭe rekompencadis la grekon. Lia naturo estis ankoraŭ tro romana, ke li sentu fremdan doloron kaj ke li okupu sian atenton per unu mizera greko. Se li eĉ ekpensus pri tio, li kredus, ke li agis prave, ordonante puni la malnoblulon. Sed li pensis pri Ligia kaj parolis al ŝi: mi ne pagos al ci malbonon por la bono, kaj kiam ci ekscios iam, kiel mi traktis tiun, kiu volis min instigi levi kontraŭ cin la manon, ci estos al mi danka pro tio. Ĉe tio li tamen ekkonsideris, ĉu Ligia aprobus lian agon rilate al Ĥilono? La kristana instruo, kiun ŝi konfesas, ordonas ja pardoni; la kristanoj pardonis ja al la mizerulo,

kvankam ili havis pli gravajn motivojn por venĝi. Nur tiam resonis en lia animo la ekkrio: «en la nomo de Kristo!» Li rememoris, ke per simila ekkrio Ĥilono liberiĝis el la manoj de la ligio, kaj li decidis forindulgi al li la reston de la puno.

Tiucele li estis jam ordononta, ke venu la intendanto, kiam tiu mem ekstaris antaŭ li kaj diris:

— Sinjoro, la maljunulo svenis, kaj eble mortis. Ĉu mi ordonu skurĝi lin plu?

— Rekonsciigu lin kaj venigu al mi.

La atriestro malaperis post la kurteno, sed la rekonsciigado ne estis videble facila, ĉar Vinicio atendis ankoraŭ dum longa tempo kaj komencis jam malpacienti, kiam fine la sklavoj enkondukis Ĥilonon kaj je signo, donita de Vinicio, mem ili foriĝis senprokraste.

Ĥilono estis pala, kiel tolo, kaj laŭlonge de liaj piedoj sur la mozaikon de la atrio fluis ŝnuretoj da sango. Li estis tamen konscia kaj, falinte sur la genuojn, komencis paroli kun etenditaj manoj.

— Dankon al ci, sinjoro! Ci estas kompatema kaj granda.

— Hundo, — diris Vinicio, — sciu, ke mi pardonis cin pro tiu Kristo, al kiu ankaŭ mi mem ŝuldas la vivon.

— Mi servos, sinjoro, lin kaj cin.

— Silentu kaj aŭskultu. Leviĝu! Ci iros kun mi kaj montros al mi la domon, kie Ligia loĝas.

Ĥilono saltleviĝis, sed apenaŭ li ekstaris sur la piedoj, li iĝis ankoraŭ pli mortpala kaj diris per svena voĉo:

— Sinjoro, mi vere estas malsata ... Ordonu doni al mi almenaŭ restaĵon el la manĝujo de cia hundo, kaj mi ir-  
os!...

Vinicio ordonis, ke oni donu al li manĝaĵon, oran moneron kaj mantelon. Sed Ĥilono, kiun malfortigis la batoj kaj la malsato, ne povis iri eĉ post la manĝo, kvankam teruro levis la harojn sur lia kapo, ke Vinicio povus konsideri lian malfortecon kiel malobeon kaj ordoni skurĝi lin denove.

— Nur varmigu min vino, — li ripetadis, klakante per la dentoj, — kaj mi tuj povos iri, eĉ ĝis granda Grekujo.

Efektive post certa tempo li reakiris iom da fortoj kaj ili eliris. La vojo estis longa, ĉar Lino loĝis, kiel plimulto de la kristanoj, en Transtibero, en negranda distanco de la domo de Mirjam'. Ĥilono montris fine al Vinicio apartan dometon, ĉirkaŭitan per muro, plene surkreskita de heder-  
roj, kaj diris:

— Ĉi tie, sinjoro.

— Bone, — diris Vinicio, — nun iru for, sed antaŭe aŭskultu, kion mi diras al ci: forgesu, ke ci min servis; forge-

su, kie loĝas Mirjam', Petro kaj Glaŭko; forgesu ankaŭ pri tiu ĉi domo kaj pri ĉiuj kristanoj. Ĉiumonate venadu en mian domon, kie Demaso la liberigito elpagados al ci po du oraj moneroj. Sed se ci spionos plue la kristanojn, mi cin ordonos mortskurĝi aŭ transdonos cin en la manojn de la urboprefekto.

Ĥilono riverencis kaj diris:

— Mi forgesos.

Sed kiam Vinicio malaperis post stratangulo, Ĥilono etendis post li la manojn kaj, minacante per la pugnoj, ek-kriis:

— Je Ateo<sup>247</sup> kaj Furioj! Mi ne forgesos!

Kaj denove li perdis la fortojn.

<sup>247</sup> **Ateo** (gr. Ἄτη) — malnovgreka diino de kolerego, furioza frenezo.

## Ĉapitro 33<sup>a</sup>

Vinicio iris rekte al la domo, en kiu loĝis Mirjam'. Antaŭ la pordego li renkontis Nazarion, kiu konfuziĝis je lia vido, sed li afable salutis la knabon kaj petis konduki sin en la loĝejon de la patrino.

En la loĝejo, krom Mirjam', li trovis Petron, Glaŭkon, Krispon kaj ankaŭ Paŭlon el Tarso, kiu ĵus revenis el Fregeloj. Ĉe la vido de la juna tribunuso miro bildiĝis sur ĉies vizaĝoj, li tamen diris:

- Mi salutas cin en la nomo de Kristo, kiun vi adoras.
- Glorata estu eterne lia nomo.
- Mi vidis vian virton kaj spertis vian bonecon; do mi venas kiel amiko.

— Kaj ni salutas cin, kiel amikon, — respondis Petro. Sidiĝu, sinjoro, kaj partoprenu kun ni la manĝon, kiel nia gasto.

— Mi sidiĝos kaj partoprenos vian manĝon, sed antaŭe aŭskultu min, ci, Petro kaj ci Paŭlo el Tarso, kaj ekonu mian sincerecon. Mi scias, kie estas Ligia; mi venas de antaŭ la domo de Lino, kiu trovas sin proksime de tiu ĉi loĝejo. Mi havas je ŝi rajton, donitan al mi de la imperiestro, mi havas en la urbo, en miaj domoj, ĉirkaŭ kvincent sklavojn; mi povus ĉirkaŭigi ŝian rifuĝejon kaj forkapti

ŝin, tamen mi tion ne faris kaj ne faros.

— Tial la beno de la Sinjoro estos donita al ci kaj purigita estos cia koro, — diris Petro.

— Mi dankas cin, sed aŭskultu min plu: mi ne faris tion, kvankam mi vivas en turmento kaj sopiro. Antaŭ ol mi estis kun vi, mi ŝin sendube kaptus kaj retenus perforte, sed via virto kaj via instruo, kvankam mi ĝin ne konfesas, ŝanĝis ion en mia animo, tiel ke mi ne plu decidiĝas je perforto. Mi mem ne scias, kial tiel okazis, sed tiel estas. Tial mi venas al vi, ĉar vi anstataŭas al Ligia la patron kaj la patrinon, kaj mi diras al vi: donu al mi Ligian kiel edzinon, kaj mi ĵuras al vi, ke ne nur mi ne malpermesos al ŝi konfesi Kriston, sed eĉ mem mi komencos lerni lian instruon.

Li parolis kun levita kapo, per decida tono, sed li estis kortuŝita kaj liaj piedoj tremis sub strihava mantelo; kiam post liaj vortoj sekvis silento, li komencis paroli plu, kva-zaŭ volante antaŭi malfavoran respondon:

— Mi scias, kiaj estas la malhelpoj, sed mi amas ŝin, kiel miajn okulojn, kaj kvankam mi ne estas ankoraŭ kristano, mi estas malamiko nek via, nek de Kristo. Mi volas esti antaŭ vi en vero, ke vi povu al mi fidi. Mi pledas nun pri mia vivo, tamen mi parolas la veron. Iu alia eble dirus al vi: baptu min! — mi diras: klerigu min! Mi kredas, ke



Kristo leviĝis el mortintoj, ĉar tion rakontas homoj, vivantaj per vero, kiuj lin vidis post lia morto. Mi kredas, ĉar mi mem vidis, ke via instruo naskas virton, justecon kaj kompatemon, ne krimojn, pri kiuj oni vin suspektas. Nemulte mi ĝin ĝis nun ekkonis. Tiom nur, kiom mi eksciis de vi, el viaj faroj, tiom nur, kiom mi ekkonis de Ligia, el la interparoloj kun vi. Kaj tamen mi ripetas al vi, ke eĉ en mi jam io ŝanĝiĝis pro via instruo. Antaŭe mi regis per fera mano miajn sklavojn, nun — mi ne povas. Mi ne konis kompaton — nun mi ĝin konas. Mi amis voluptoĝuojn — nun mi forkuris de la Agripa lago, ĉar abomeno sufokis la spiron en mia brusto. Antaŭe mi kredis je perforto, nun mi ĝin malkonfesis. Sciu, ke mi mem min ne rekonas, sed abomenaj iĝis al mi festenoj, vino, kantoj, citroj kaj florkronoj, abomenaj iĝis al mi la imperiestra kortego kaj nudaj korpoj kaj ĉiuj krimoj. Kaj kiam mi pensas, ke Ligia estas kiel montara neĝo, tiom pli mi ŝin amas; kaj kiam mi pensas, ke ŝi estas tia pro via instruo, mi amas tiun ĉi instruon kaj mi volas ĝin! Sed ĉar mi ĝin ne komprenas, ĉar mi ne scias, ĉu mi kapablos vivi en ĝi kaj ĉu mia naturo ĝin elportos, tial mi vivas en malcerteco kaj turmento, kvazaŭ mi vivus en mallumejo.

Ĉe tiuj vortoj la brovoj kuntiriĝis sur lia frunto en doloran sulkon kaj ruĝo aperis sur liaj vangoj, post kio li de-

nove parolis, ĉiam pli rapide kaj kun ĉiam pli granda korduŝo:

— Vi vidas! Mi suferas pro la amo kaj pro la mallumo. Oni diris al mi, ke via instruo alportas pereon al la vivo, al homa ĝojo, al feliĉo, al la leĝo, al la ordo, al la estreco kaj al la Roma regado. Ĉu tiel estas? Oni diris al mi, ke vi estas frenezaj; diru, kion vi alportas? Ĉu ami estas peko? Ĉu peko estas senti ĝojon? Ĉu peko estas deziri feliĉon? Ĉu vi estas malamikoj de la vivo? Ĉu kristano devas esti mizerulo? Ĉu mi devas rezigni Ligian? Kia estas via vero? Viaj faroj kaj viaj vortoj estas kiel klara akvo, sed kia estas la fundo de tiu ĉi akvo? Vi vidas, ke mi estas sincera. Disigu la mallumon! Ĉar oni diris al mi ankaŭ tion: Grekuj kaj romoj kreis la saĝecon kaj la belecon, Romo la potencon, kaj kion ili alportas? Do diru, kion vi alportas? Se post via pordo estas lumo, malfermu al mi.

— Ni alportas amon, — diris Petro.

Kaj Paŭlo el Tarso aldonis:

— Se mi parolus lingvojn homajn kaj anĝelajn, sed ne havus amon, mi estus, kiel vansonanta kupraĵo...

Sed la koron de la apostolo movis tiu turmentata animo, kiu, kiel birdo fermita en kaĝo, baraktis al la aero kaj al la suno, do etendinte al Vinicio la manojn, li diris:

— Kiu frapas, estos al li malfermite, kaj la favoro de la

Sinjoro estas kun ci, tial mi benas cin, mi benas cian animon kaj cian amon en la nomo de la Savinto de la mondo.

Vinicio, kiu jam antaŭe parolis kun ekscito, ekaŭdinte la benon, eksaltis al Petro, kaj tiam okazis fakto eksterordinara. Jen tiu ĉi posteulo de la *kviritoj*, kiu antaŭ nelonge ne rekonis en fremdulo homon, kaptis la manojn de la maljuna galileano kaj komencis dankeme premi ilin al la buŝo.

Kaj Petro ekĝojis, ĉar li komprenis, ke lia semado falis sur unu kampon pli kaj ke lia fiŝkaptista reto enprenis unu animon pli.

La ĉirkaŭantoj, ne malpli ĝojante pro tiu malkaŝa signo de respekto al la apostolo de Dio, eligis per unu voĉo:

— Glorata estu Dio en la altaĵoj!

Vinicio leviĝis kun ĝojluma vizaĝo kaj komencis paroli:

— Mi vidas, ke feliĉo povas loĝi inter vi, ĉar mi sentas min feliĉa, kaj mi kredas, ke vi konvinkos min same en la aliaj aferoj. Sed tio ne okazos en Romo: Nerono veturas Ancion, kaj mi devas kuniri, ĉar mi ricevis la ordonon. Vi scias, ke ne obei signifas morti. Sed se mi trovis favoron en viaj okuloj, veturu kun mi, por ke vi instruu al mi vian veron. Vi estos tie pli sekuraj ol mi mem, en tiu granda amasego da homoj vi povos prediki vian veron en la kort-

ego mem de la imperiestro. Oni diras, ke Akteo estas kristanino, kaj ankaŭ inter la pretorianoj estas kristanoj, ĉar mi mem vidis, ke la soldatoj surgenuiĝis antaŭ vi ĉe la Nomentana pordego. En Ancio mi havas vilaon, kie ni kunvenados por tie, kelkajn paŝojn de Nerono, aŭskulti viajn instruojn. Glaŭko diris al mi, ke por unu animo vi estas pretaj migri al la fino de la mondo, faru do por mi tion, kion vi faris por tiuj, por kiuj vi venis ĉi tien el la malproksima Judeo, faru tion kaj ne forlasu mian animon!

Ili, ekaŭdinte ĉi tion, komencis interkonsili, pensante kun ĝojo pri la venko de sia instruo kaj pri la signifo, kiun por la idolana mondo havos konvertiĝo de aŭgustano kaj posteulo de unu el la plej malnovaj romanaj gentoj. Ili estis pretaj efektive migri al la ekstremoj de la mondo por unu homa animo, kaj de post la morto de la majstro ili faris ja nenion alian, do rifuza respondo eĉ ne venis en ilian penson. Sed Petro estis ĉi-momente paŝtisto de la tuta ŝafaro, do ne povis veturi, tamen Paŭlo el Tarso, kiu antaŭ nelonge estis en Aricio kaj en Fregeloj, kaj estis ironta denove longan vojaĝon en Orienton por viziti la tieajn komunumojn kaj inspiri al ili novan spiriton de fervoro, konsentis akompani la junan tribunuson en Ancion, ĉar tie li povis facile trovi ŝipon, irantan la grekajn marojn.

Vinicio, kvankam li malĝojiĝis, ke Petro, al kiu li tiom ŝuldis, ne akompanos lin, dankis tamen kore kaj poste sin turnis al la maljuna apostolo kun la lasta peto:

— Sciante la loĝejon de Ligia, — li diris, — mi povus mem iri al ŝi kaj demandi, kiel decas, ĉu ŝi akceptos min kiel edzon, se mia animo iĝos kristana. Sed mi preferas peti cin, apostolo: permesu al mi vidi ŝin, aŭ mem enkonduku min al ŝi. Mi ne scias, kiel longe mi devos resti en Ancio, kaj memoru, ke kun la imperiestro neniu estas certa pri la morgaŭa tago. Eĉ Petronio jam diris al mi, ke mi ne estos tie tute sekura. Mi vidu ŝin antaŭe, mi satigu per ŝi la okulojn kaj demandu, ĉu ŝi forgesos al mi la malbonon kaj ĉu ŝi partoprenos kun mi bonon.

Kaj Petro la apostolo ridetis bonkore kaj diris:

— Kiu rifuzus al ci la justan ĝojon, mia filo?

Vinicio denove kliniĝis al liaj manoj, ĉar li jam tute ne povis regi plu la plenŝvelintan koron; la apostolo prenis lin je la tempioj kaj diris:

— Kaj la imperiestron ci ne timu, ĉar tion mi diras al ci, ke eĉ unu haro ne falos de cia kapo.

Poste li sendis Mirjamon por venigi Ligian, ordonante al ŝi ne diri, kiun ŝi trovos inter ili por kaŭzi al la knabino tiom pli grandan ĝojon.

La distanco ne estis granda, do post nelonga tempo la

kunvenintoj ekvidis el la ĉambro meze de la ĝardenaj mirtoj Mirjamon konduki Ligian je la mano.

Vinicio volis kuri renkonten, sed ĉe la vido de tiu amegata vizaĝo la feliĉo senigis lin je la fortoj — kaj li staris kun bateganta koro, senspire, apenaŭ povante teni sin sur la piedoj, centoble pli tuŝita ol tiam, kiam unuafoje en la vivo li aŭdis la sagojn de la partoj, fajfantajn preter lia kapo.

Ŝi enkuris, atendente nenion, kaj ĉe lia vido ankaŭ ŝi haltis, kvazaŭ fiksita al la tero. Ŝia vizaĝo ruĝiĝis kaj tuj tre paliĝis, poste ŝi komencis rigardi per mirplenaj kaj kune timigitaj okuloj la ĉeestantojn.

Sed ĉirkaŭe ŝi vidis serenajn rigardojn, plenajn je boneco, kaj la apostolo Petro proksimiĝis al ŝi kaj diris:

— Ligia, ĉu ci amas lin plu?

Sekvis momento da silento. Ŝia buŝo komencis tremi, kiel la buŝo de infano, kiu estas preta plori kaj kiu, sentante sin kulpa, vidas tamen, ke ĝi devas konfesi la kulpon.

— Respondu, — diris la apostolo.

Tiam kun humileco kaj timo en la voĉo ŝi elflustris, ŝovante sin malsupren al la genuoj de Petro:

— Jes ...

Sed Vinicio en la sama momento genuiĝis apud ŝi; Petro metis la manojn sur iliajn kapojn kaj diris:

— Amu unu la alian en la Sinjoro kaj je lia gloro, ĉar nenia peko estas en via amo.

## Ĉapitro 34<sup>a</sup>

Promenante en la ĝardeneto, Vinicio rakontis al ŝi en vortoj mallongaj, elŝiritaj el la fundo de la koro, tion, kion li antaŭ momento konfesis al la apostoloj: nome la maltrankvilecon de sia animo, la ŝanĝojn, kiuj en li okazis, kaj fine tiun senliman sopiron, kiu vualis lian vivon de la tempo, kiam ŝi forlasis la loĝejon de Mirjam'. Li konfesis al Ligia, ke li volis ŝin forgesi, sed ne povis. Li pensis pri ŝi dum tutaj tagoj kaj tutaj noktoj. Memorigadis ŝin al li tiu kruceto, ligita el buksaj branĉetoj, kiun ŝi lasis al li kaj kiun li lokis en sian lararejon kaj malgraŭvole adoris, kvazaŭ ion dian. Kaj li sopiris ĉiam pli forte, ĉar la amo estis pli potenca ol li, kaj jam ĉe Aŭlo ĝi tute ekregis lian animon ... Al aliaj la fadenon de la vivo ŝpinas Parcoj, sed al li ŝpinis ĝin amo, sopiro kaj malĝojo. Malbonaj estis liaj agoj, sed ili fluis el lia amo. Li amis ŝin ĉe Aŭlo kaj sur Palatino, kaj kiam li ŝin vidis en Ostriano, aŭskultantan la vortojn de Petro, kaj kiam li iris kun Krotono por ŝin forkapti, kaj kiam ŝi gardis ĉe lia lito, kaj kiam ŝi lin forlasis. Venis Ĥilono, kiu malkaŝis ŝian loĝejon kaj konsilis ŝin forkapti, sed li preferis puni Ĥilonon kaj iri al la apostoloj

peti pri la vero kaj pri ŝi ... Kaj estu benita tiu momento, en kiu tia penso venis en lian kapon, ĉar jen li estas apud ŝi, kaj ŝi ja ne forkuros de li plu, kiel ŝi forkuris el la loĝejo de Mirjam'?

— Mi ne de ci forkuris, — diris Ligia.

— Do kial ci tion faris?

Kaj ŝi levis al li siajn iridkolorajn okulojn, poste, mallevinte la hontigitan vizaĝon, respondis:

— Ci scias ...

Vinicio eksilentis momente pro la troabundo da ĝojo, poste li komencis denove rakonti, kiel grade liaj okuloj malfermiĝadis al tio, ke ŝi estas tute diferenca de la romaninoj kaj simila eble al la sola Pomponia. Li cetere ne sciis bone eldiri tion al ŝi, ĉar li mem ne konsciigis al si klare tion, kion li sentis, ke en ŝi naskiĝas en la mondon iu tute nova beleco, kiu ĝis nun ne ekzistis en la mondo, kaj kiu estas ne nur statuo, sed ankaŭ animo. Li diris al ŝi aliflanke tion, kio plenigis ŝin per ĝojo, ke li ekamis ŝin eĉ pro tio, ke ŝi forkuris de li, kaj ke ŝi estos al li sankta ĉe la hejma fajro.

Poste, kaptinte ŝian manon, li ne povis paroli plu, li nur rigardis ŝin kun ravo, kiel reakiritan feliĉon de la vivo kaj ripetadis ŝian nomon, kvazaŭ volante certiĝi, ke li estas apud ŝi:



— Ho Ligia! ho Ligia!...

Fine li komencis demandi, kio okazis en ŝia animo, kaj ŝi konfesis al li, ke ŝi ekamis lin jam en la domo de Aŭlo, kaj ke se li rekondukus ŝin al ili de Palatino, ŝi konfesus al ili sian amon kaj penus elpeti por li ilian pardonon.

— Mi ĵuras al ci, — diris Vinicio, — ke eĉ ne venis al mi la penso forpreni cin de Aŭlo. Petronio iam diros al ci, ke mi diris al li jam tiam: ŝi ŝmiru mian pardonon per lupa graso kaj eksidu ĉe mia hejmfajro! Sed li mokis min kaj sugestis al Nerono, ke li cin ekpostulu, kiel garantiulinon, kaj transdonu al mi. Kiomfoje mi malbenadis lin en mia doloro! Sed eble tamen favora sorto tiel aranĝis, ĉar alie mi ne ekkonus la kristanojn kaj ne komprenus cin...

— KREDU al mi, Marko, — respondis Ligia, — ke tiel Kristo intence kondukis cin al si.

Vinicio levis la kapon kun certa miro.

— Vere! — li respondis vive, — ĉio kombiniĝis tiel strange, ke mi, serĉante cin, renkontis la kristanojn ... En Ostriano mi aŭskultis kun mirego la apostolon, ĉar tiajn aferojn mi neniam aŭdis. Ci preĝis por mi, Ligia.

— Jes! — ŝi respondis.

Ili pasis preter la laŭbeto, kovrita de hedera densaĵo, kaj proksimiĝis al la loko, kie Urso, sufokinte Krotonon, ĵetis sin sur Vinicion.

— Tie ĉi, — diris la juna viro, — se ci ne malpermesus, mi pereus.

— Ne parolu pri tio! — respondis Ligia, — kaj ne memorigu tion al Urso.

— Ĉu mi povus venĝi kontraŭ li pro tio, ke li cin defendis? Se li estus sklavo, mi tuj donus al li liberecon.

— Se li estus sklavo, Aŭlo lin delonge liberigus.

— Ĉu ci memoras, — diris Vinicio, — ke mi volis revenigi cin al Aŭlo? Sed ci respondis al mi, ke la imperiestro povus pri tio ekscii kaj venĝi kontraŭ ili. Rigardu: nun ci povos ilin vidi, kiomfoje ci volos.

— Kial Marko?

— Mi diras «nun», kaj mi pensas, ke ci povos sendanĝere vidadati ilin, kiam ci estos mia edzino. Jes! Ĉar se Nerono, eksciinte pri tio, demandos, kion mi faris kun la konfidita al mi garantiulino, mi diros: mi edziĝis al ŝi kaj ŝi vizitadas la domon de Aŭlo laŭ mia permeso. Li ne restos en Ancio longe, ĉar li volas iri Aĥajon, kaj se li eĉ restus, mi ne bezonas vidi lin ĉiutage. Kiam Paŭlo el Tarso instruos al mi vian veron, mi tuj akceptos bapton kaj revenos ĉi tien, reakiros la amikecon de la Plaŭcioj, kiuj en proksimaj tagoj revenos en la Urbon, kaj estos plu neniam baroj. Tiam mi kunprenos cin kaj sidigos ĉe mia hejmfajro! *O! Carissima, carissima!*

Dirinte tion, li etendis la brakojn, kvazaŭ vokante la ĉielon ateste al sia amo, kaj Ligia, levinte al li siajn lumajn okulojn, diris:

— Kaj tiam mi diros: «Kie ci, Gajo, tie mi, Gaja»<sup>248</sup>.

— Ne, Ligia! — vokis Vinicio, — mi ĵuras al ci, ke neniam iu virino estis tiel respektata en la hejmo de sia edzo, kiel ci estos en la mia.

Dum momento ili paŝis silente, ne povante enpreni en la brustojn la feliĉon, plenaj je amo unu al la alia, similaj al paro da dioj kaj tiel belegaj, kvazaŭ ilin kune kun la floroj naskus en la mondon la printempo.

Fine ili stariĝis apud cipreso, kreskanta proksime de la loĝeja pordo. Ligia apogis sin sur ĝia trunko, kaj Vinicio denove komencis peti per vibranta voĉo:

— Ordonu al Urso iri en la domon de Aŭlo, preni ciajn aĵojn kaj infanajn ludilojn kaj transporti ilin al mi.

Sed ŝi, flamiĝinte, kiel rozo aŭ kiel matenruĝo, diris:

— La moro ordonas alie ...

— Mi scias. Ordinare portas ilin *pronuba*<sup>249</sup> nur post la novedzino, sed faru tion por mi. Mi kunprenos ilin en mian vilaon en Ancio kaj ili cin memorigados al mi.

<sup>248</sup> Latine: *Ubi tu Gajus, ibi ego Gaja* — romana geedziĝa formulo prononcata de la fianĉino.

<sup>249</sup> *Pronuba* akompanis novedzinon kaj instruis ŝin pri la devoj de edzino. (*Noto de la aŭtoro.*)

Ĉe tio li kunmetis la manojn, kiel infano, kiu petas:

— Pomponia revenos en proksimaj tagoj, do faru tion, dia, faru, *carissima* mia!

— Pomponia faru, kiel ŝi volos, — respondis Ligia, ruĝiĝante ankoraŭ pli ĉe la mencio pri *pronuba*.

Kaj denove ili eksilentis, ĉar la amo komencis sufoki la spiron en iliaj brustoj. Ligia staris, apogite per la dorso sur la cipreso, kun vizaĝo blankanta en la ombro, kvazaŭ floro, kun mallevitaj okuloj kaj pli vive ondanta brusto; la vizaĝo de Vinicio iĝadis alterne flamanta kaj pala. En la posttagmeza silento ili aŭdis la batadon de siaj koroj kaj en la komuna ekstazo tiu ĉi cipreso, la mirtaj arbustoj kaj la hederoj de la laŭbeto alisorĉiĝis por ili en ĝardenon de amo.

Sed Mirjam' aperis en la pordo kaj invitis ilin al la posttagmeza manĝo. Ili eksidis do inter la apostoloj, kaj tiuj rigardis ilin kun ĝojo, kiel la junan generacion, kiu post ilia morto devis konservi kaj semi plue la grajnoj de la nova instruo. Petro rompis kaj benis la panon; sur ĉiuj vizaĝoj estis paco kaj ia grandega feliĉo ŝajnis plenplenigi tiun tutan ĉambron.

— Vidu, — diris fine Paŭlo, turnante sin al Vinicio, — ĉu ni estas malamikoj de la vivo kaj de ĝojo?

Kaj tiu respondis:

— Mi scias nun, kiel estas, ĉar neniam mi estis tiel feliĉa, kiel meze de vi.

## Ĉapitro 35<sup>a</sup>

La saman tagon vespere Vinicio, irante tra Forumo hejmen, rimarkis ĉe la eniro al la Tuska strato la orumitan portilon de Petronio, portatan de ok bitinianoj, kaj haltiginte ilin per signo de la mano, li proksimiĝis al la kurtenoj.

— Havu agrablan kaj dolĉan songon! — li ekkriis, ridante, ĉe la vido de la dormanta Petronio.

— Ha, tio estas ci! — diris Petronio, vekiginte. — Jes, mi ekdormetis, ĉar mi pasigis la nokton sur Palatino. Nun mi iras aĉeti ion por legi en Ancio ... Kio nova?

— Ĉu ci migras tra librovendejoj?

— Jes. Mi ne volas fari malordon en mia biblioteko, do por la vojaĝo mi preparas apartajn provizojn. Laŭdire aperis novaj verkoj de Muzonio kaj de Seneko. Mi serĉas ankaŭ Persjon<sup>250</sup> kaj certan eldonon de la eklogoj de Virgilio, kiun mi ne posedas. Ho, kiel mi estas laca kaj kiel miaj manoj doloras pro la senĉesa malvolvado de la rulaĵoj de la stangetoj... Ĉar se oni foje estas en librovendejo,

---

<sup>250</sup> A. **Persius Flaccus** (34–62) — roma kavaliro, satira poeto, filozofo kaj lernanto de Lukano.

oni scivolas vidi tion kaj ion. Mi estis ĉe Aviruno, ĉe Atrakto en Argileto, kaj antaŭe ankaŭ ĉe la Sozioj<sup>251</sup> en la Sandalista strato. Je Kastoro! Kiel dormema mi estas!

— Ci estis sur Palatino, do mi cin demandas pri novaĵoj. Aŭ ĉu ci scias? Forsendu la portilon kaj la skatolon kun la libroj, kaj venu al mi. Ni parolos pri Ancio kaj pri io pli.

— Bone, — diris Petronio, — elŝovante sin el la portilo. — Ci ja scias sendube, ke postmorgaŭ ni foriros Ancion.

— Kiamaniere mi povus ĝin scii?

— En kiu mondo ci vivas? Do mi unua anoncas al ci la novaĵon? Jes! Estu preta por postmorgaŭ matene. Pizoj kun olivoleo ne helpis, ŝalo ĉirkaŭ la dika nuko ne helpis kaj la Kuprobarba raŭkiĝis. Sekve de tio ĉia prokrasto estas esceptita. Li malavaras malbenojn al Romo kaj al ĝia aero, li volus ĝin samniveligi kun la tero aŭ detruiri per fajro, kaj li sopiras al la maro plej baldaŭ. Li diras, ke tiuj odoroj, kiujn la vento portas el la mallarĝaj stratetoj, puŝos lin en tombon. Hodiaŭ oni faris grandegajn oferdonojn en ĉiuj temploj, ke li reakiru la voĉon — kaj ve al Romo, precipe al la senato, se li ĝin baldaŭ ne reakiros.

— Sencele estus tiam veturi Aĥajon.

<sup>251</sup> «**Sozio**. Helena vira nomo...» [NPIV] (lat. *Sosius*).

— Ĉu do nia dia imperiestro posedas nur tiun ĉi solan talenton? — respondis Petronio, ridante. — Li prezentiĝus en la olimpaj ludoj kiel poeto kun sia brulo de Trojo, kiel ĉaristo, kiel muzikisto, kiel atleto, kaj ĉiuokaze li prenis ĉiujn laŭrokronojn, destinitajn por la venkontoj. Ĉu ci scias, kial tiu simio raŭkiĝis? Jen hieraŭ li ekvolis egali per danco nian Parison kaj li dancis al ni la aventuron de Ledo, ĉe kio li troŝvitis kaj malvarmumis. Li estis tute malseka kaj gluaĉa, kiel angilo ĵus eltirita el akvo. Li ŝanĝadis maskojn unu post la alia, li sin turnis, kiel ŝpinilo, svingis per la manoj, kiel ebria maristo, kaj abomeno eĉ kaptis, kiam oni rigardis tiun grandegan ventron kaj tiujn maldikajn piedojn. Pariso instruis lin de du semajnoj, sed imagu Ahenobarbon kiel Ledon aŭ kiel dion-cignon! Jen cigno — kion diri! Sed li volas publike prezentiĝi kun tiu pantomimo, unue en Ancio, kaj poste en Romo.

— Oni jam indigniĝis, ke li kantis publike, sed imagu nur ke roma imperiestro prezentiĝos kiel mimikisto! Ne, tion Romo ja ne toleros!

— Mia kara, Romo ĉion toleros, kaj la senato proklamos dankodiron al la «patro de la patrujo».

Post momento li aldonis:

— Kaj la popolaĉo ankoraŭ fieras pro tio, ke la imperiestro estas ĝia amuzisto.

— Diru mem, ĉu oni povus malnobliĝi pli multe?

Petronio movis la ŝultrojn.

— Ci vivas trankvile hejme, en cia meditado jen pri Ligia, jen pri la kristanoj, do ci ne scias verŝajne, kio okazis antaŭ kelkaj tagoj. Nerono ja publike sin edzinigis al Pitagoro. Li ludis la rolon de la novedzino. Ŝajnus, ke la mezuro de la frenezaĵoj jam estas superplena, ĉu ne? Kaj kion ci diros: venis la vokitaj pastroj kaj solene lin edzinigis. Mi ĉeestis tion! Ankaŭ mi povas multe elporti, tamen mi ekpensis, mi konfesas, ke la dioj, se ili ekzistas, devus doni ian signon... Sed Nerono ne kredas je la dioj kaj li pravas.

— Li do estas en unu persono ĉefpastro, dio kaj ateisto, — diris Vinicio.

Petronio ekridis:

— Vere! Ĝi ne venis en mian kapon, kaj tio estas kombino, kiun la mondo ĝis nun ne vidis.

Poste, haltinte por momento, li diris:

— Ĉar oni ankaŭ aldonu, ke tiu ĉefpastro, kiu ne kredas je la dioj, kaj tiu dio, kiu ilin mokas, timas ilin, kiel ateisto.

— Pruvas ĝin tio, kio okazis en la templo de Vesto.

— Kia estas nia mondo!

— Kia estas la mondo, tia estas la imperiestro! — Sed



tio ne daŭros longe.

Tiel interparolante, ili eniris la domon de Vinicio, kiu gaje vokis, ke oni donu vespermanĝon, kaj poste, turninte sin al Petronio, diris:

— Ne, mia kara, la mondo devas renaskiĝi.

— Ni ĝin ne renaskigos, — diris Petronio, — almenaŭ tial, ke en la tempo de Nerono homo estas kiel papilio: li vivas en la suno de la imperiestra favoro, kaj ĉe unua malvarma blovo li pereas ... se li eĉ ne volus! Je la filo de Majo: ofte mi faras al mi la demandon, kiamaniere tiu Lucio Saturneno povis atingi la aĝon de naŭdek tri jaroj, postvivi Tiberion, Kaligulon, Klaŭdion?... Sed tio ne gravas. Ĉu ci permesos sendi cian portilon por Eŭniko? Mia dormemo iel pasis kaj mi volus ĝoji. Ordonu al citristo ludi dum la vespermanĝo, kaj poste ni parolos pri Ancio. Ni devas pensi pri tio, precipe pri ci.

Vinicio ordonis, ke oni sendu la portilon por Eŭniko, sed li deklaris, ke li tute ne intencas streĉi sian cerbon pro la restado en Ancio. Streĉu ĝin tiuj, kiuj ne scias vivi alie ol en la radioj de la imperiestra favoro. La mondo ne finiĝas sur Palatino, precipe por tiuj, kiuj havas ion alian en la koro kaj en la animo.

Li diris tion tiel senzorge, kun tia vigleco kaj tiel gaje, ke ĉio tio frapis Petronion, do, rigardinte lin momente, li

diris:

— Kio okazas al ci? Ci estas tia hodiaŭ, kia ci estis en la tempo, kiam ci portis ankoraŭ oran *bulaon* ĉe la kolo.

— Mi estas feliĉa, — respondis Vinicio. — Mi invitis cin speciale por tion diri al ci.

— Kio al ci okazis?

— Io, kion mi ne fordonus eĉ por la Roma imperio.

Dirinte tion li sidiĝis, metis la brakon sur la apogilon de la seĝo, la kapon sur la brakon, kaj komencis paroli kun vizaĝo plena je ĝojridetoj kaj kun luma rigardo:

— Ĉu ci memoras, kiel ni estis kune ĉe Aŭlo Plaŭcio kaj kiel ci tie vidis unuafoje dian knabinon, kiun ci mem nomis Aŭroro kaj printempo? Ĉu ci memoras tiun Psiĥon<sup>125</sup>, tiun senkomparan, tiun plej belan el la knabinoj kaj el viaj diinoj?

Petronio rigardis lin kun tia mirego, kvazaŭ li volus kontroli, ĉu lia kapo estas en ordo.

— Kian lingvon ci parolas? — li diris fine. — Kompreneble, mi memoras Ligian.

Kaj Vinicio diris:

— Mi estas ŝia fianĉo.

— Kio?...

Sed Vinicio saltleviĝis kaj ordonis, ke venu la intend-

<sup>125</sup> «**Psiĥo**. (mit.) Tre bela princino (personigo de la animo), amata de Eroso» [NPV] (gr. Ψυχή).

anto.

— Ekstaru ĉi tie antaŭ mi ĉiuj sklavoj, ĉiuj senescepte, rapide!

— Ĉu ci estas ŝia fianĉo? — ripetis Petronio.

Sed antaŭ ol li ekregis sian miron, la grandega atrio de la domo de Vinicio eksvarmis je homoj. Senspire kuris maljunuloj, fortaĝaj viroj, virinoj, knabetoj kaj knabinoj. Ĉiumomente la atrio iĝadis pli plena; en la koridoroj, nomataj *faŭces*, oni aŭdis diverslingvajn voĉojn de sklavoj, vokantaj unu la alian. Fine ili ĉiuj viciĝis ĉe la muroj kaj inter la kolonoj. Vinicio, stariĝinte apud la pluvujo, sin turnis al Demaso la liberigito kaj diris:

— Tiuj el la sklavoj, kiuj servis en la domo dudek jarojn, prezentos sin morgaŭ ĉe la pretoro, kie ili ricevos liberecon; tiuj, kiuj servas malpli longe, ricevos po tri oraj moneroj kaj duoblan porcion dum semajno. En la kamparajn punlaborejojn sendu la ordonon, ke oni forpardonu ĉiujn punojn, senkatenigu la homojn kaj nutru ilin satige. Sciu, ke venis por mi feliĉa tago kaj mi volas, ke ĝojo estu en la domo.

Ili dum momento staris silentaj, kvazaŭ ne kredante al siaj oreloj, post kio ĉiuj brakoj leviĝis subite supren kaj ĉiuj buŝoj ekkriis:

— Aaa! Sinjoro! Aaa!

Vinicio forigis ilin per la signo de la mano, do kvankam ili deziris danki kaj fali al liaj piedoj, ili foriris rapide, plenigante la domon per feliĉo de la keloj ĝis la tegmento.

— Morgaŭ, — diris Vinicio, — mi ordonos al ili kunveni en la ĝardeno kaj desegni unu antaŭ aliaj signojn, kiajn ili volos. Tiujn, kiuj desegnos fiŝon, liberigos Ligia.

Sed Petronio, kiu neniam ion longe miris, reakiris sian trankvilecon kaj demandis:

— Fiŝon? Ha jes! Mi memoras, kion diris Ĥilono: ĝi estas la signo de la kristanoj.

Poste li etendis la manon al Vinicio kaj diris:

— Feliĉo estas ĉiam tie, kie la homo ĝin vidas. Floro la diino ŝutu rozojn sub viajn piedojn dum longaj jaroj. Mi deziras al ci ĉion, kion ci mem al ci deziras.

— Ĉi-okaze mi dankas, ĉar mi pensis, ke ci malkonsilos, kaj tio estus, kiel ci vidas, perdo de tempo.

— Mi, malkonsilos? Tute ne. Kontraŭe, mi diras al ci, ke ci bone faras.

— Ha, ŝanĝemulo! — respondis gaje Vinicio, — ĉu ci forgesis, kion ci iam diris al mi, kiam ni estis elirantaj el la domo de Grecina?

Sed Petronio respondis kun malvarma sango:

— Ne! Sed mi ŝanĝis opinionon.

Kaj post momento li aldonis:

— Mia kara, en Romo ĉio ŝanĝiĝas. Edzoj ŝanĝas la edzinojn, edzinoj ŝanĝas la edzojn, kial mi ne ŝanĝu mian opinion? Nemulte mankis, ke Nerono edziĝu al Akteo, kiun oni speciale por li devenigis el reĝa familio. Kio do estus? Li havus honestan edzinon, kaj ni — honestan aŭgustinon. Je Proteo kaj liaj maraj solejoj! Mi ĉiam ŝanĝados mian opinion, kiomfoje mi tion trovos konforma kaj oportuna. Koncerne Ligian, ŝia reĝa deveno estas pli certa ol la pergamaj antaŭuloj de Akteo. Sed ci gardu cin en Ancio kontraŭ Popea, kiu estas venĝema.

— Mi eĉ ne intencas! Eĉ ne unu haro falos de mia kapo en Ancio.

— Se ci kredas, ke ci mirigos min duafoje, ci eraras, sed de kie ci havas tiun certecon?

— Petro la apostolo tion diris al mi.

— Ha, Petro la apostolo tion diris al ci! Kontraŭ tio ekzistas neniu argumento, permesu tamen, ke mi entreprenu certajn gardrimedojn, almenaŭ tial, ke Petro la apostolo ne montriĝu falsa profeto, ĉar se hazarde Petro la apostolo erarus, li povus perdi cian fidon, kiu sendube ankaŭ estonte estos al Petro la apostolo bezona.

— Faru, kion ci volas, sed mi kredas al li. Kaj se ci pensas, ke ci min malinklinigos al li, ironie rondripetante lian nomon, ci eraras.

— Nur unu demando pli: ĉu ci jam estas kristano?

— Ankoraŭ ne, sed Paŭlo el Tarso veturos kun mi por klarigadi al mi la instruon de Kristo, kaj poste mi akceptos bapton, ĉar tio, kion ci diris, ke ili estas malamikoj de la vivo kaj de ĝojoj, estas malvera.

— Tiom pli bone por ci kaj por Ligia, — respondis Petronio.

Poste, movinte la ŝultrojn, li diris, kvazaŭ al si mem:

— Mirinde estas tamen, kiel tiuj homoj scias varbi konfesantojn kaj kiel tiu sekto disvastiĝas.

Kaj Vinicio respondis kun tia fervoro, kvazaŭ ankaŭ li mem jam estus baptita:

— Jes! Miloj kaj dekmiloj estas en Romo, en la urboj de Italujo, en Grekujo, en Azio. Kristanoj estas en la legioj kaj inter la pretorianoj, ili estas en la imperiestra palaco mem. Konfesas tiun instruon sklavoj kaj civitanoj, riĉuloj kaj malriĉuloj, plebanoj kaj patricioj. Ĉu ci scias, ke kelkaj Kornelioj estas kristanoj, ke Pomponia Grecina estas kristanino, ke kristanino estis laŭdire Oktavia kaj estas Akteo? Jes, tiu instruo ekposedas la mondon kaj ĝi sola povos ĝin renaskigi. Ne movu la ŝultrojn, ĉar kiu scias, ĉu post unu aŭ du monatoj ci ĝin mem ne akceptos.

— Mi? — diris Petronio. — Ne, je la filo de Leto! Mi ĝin ne akceptos, eĉ se estus en ĝi vero kaj saĝeco tiel homa,

kiel dia ... Tio postulus penon, kaj mi ne ŝatas fari al mi penojn ... Tio postulus rezignojn, kaj mi ŝatas rezigni nenion en la vivo. Al cia naturo, simila al fajro kaj bolaĵo, ĉiam povis okazi io simila, sed al mi? Mi havas miajn gemojn, miajn kameojn, miajn vazojn kaj mian Eŭnikon. Je Olimpo mi ne kredas, sed mi ĝin aranĝas al mi sur la tero kaj mi floras, ĝis kiam trapafos min la sagoj de la dia pafarkisto, aŭ ĝis kiam Nerono ordonos al mi distranĉi miajn vejnojn. Mi tro ŝatas oportunan triklinion kaj la aromon de violoj. Mi ŝatas eĉ niajn diojn ... kiel retorikajn parolturnojn, kaj Aĥajon, kien mi intencas iri kun nia grasa, maldikkrura, nekomparebla dia Cezaro, Aŭgusto, Periodoniko<sup>252</sup>, Herkulo, Nerono!...

Dirinte ĉi tion li gajiĝis ĉe la nura penso, ke li povus akcepti la instruon de la galileaj fiŝkaptistoj, kaj li komencis duonvoĉe kanteti:

*Per mirtverdaĵo mi kovros mian glavon,  
Kun Harmodioso kaj Aristogito ...*

Sed li interrompis, ĉar la anoncisto sciigis, ke Eŭniko alvenis.

Baldaŭ post ŝia alveno oni servis la vespermanĝon, dum kiu, post kelkaj kantoj kantitaj de citristo, Vinicio ra-

<sup>252</sup> *Periodoniko* (gr. περιόδονικης lat. periodonica) estas malnovgreka titolo de atleto venkinta en ĉiuj 4 «Tuthelenujaj ludoj» («periodoj»). Nerono sin proklamis periodoniko.

kontis al Petronio pri la vizito de Hîlono kaj pri tio, kiel tiu vizito inspiris al li la ideon iri rekte al la apostoloj, venintan ĝuste dum la skurĝado de Hîlono.

Al tio Petronio, kiun denove komencis kapti dormemo, metis la manon al la frunto kaj diris:

— La ideo estis bona, se la efiko estis bona. Sed koncerne Hîlonon, mi ordonus doni al li kvin orajn monerojn, se tamen ci ordonis lin skurĝi, estus preferinde lin mortskurĝi, ĉar kiu povas scii, ĉu iam senatanoj ne riverencos antaŭ li, kiel hodiaŭ ili riverencas antaŭ nia kavaliro Aleno<sup>253</sup> Vatinio. Bonan nokton.

Kaj, depreninte la florkronojn, li komencis kune kun Eŭniko prepari sin al hejmeniro. Kiam ili foriĝis, Vinicio iris en la bibliotekon kaj skribis al Ligia jene:

*«Mi volas, ke, kiam ci malfermos ciajn belegajn okulojn, tiu ĉi letero diru al ci: bonan tagon! Tial mi skribas hodiaŭ, kvankam morgaŭ mi cin vidos. La imperiestro postmorgaŭ veturos Ancion kaj mi, ho ve! devas lin akompani. Mi ja diris jam al ci, ke malobei signifas endanĝerigi la vivon, kaj mi nun ne havus la kuraĝon morti. Sed se ci ne volas, reskribu al mi unu vorton, tiam mi restos, kaj forturni de mi la danĝeron estos jam la tasko de Petronio. Hodiaŭ, en la tago de ĝojo, mi faris donac-*

<sup>253</sup> Petronio mokas pri la ŝuista deveno de *Titus Vatinius* (vd la noton [8]).



ojn al ĉiuj sklavoj, kaj tiujn, kiuj servis en mia domo dudek jarojn, mi kondukos morgaŭ al la pretoro por ilin liberigi. Ci, mia kara, devus tion aprobi, ĉar ŝajnas al mi, ke ĝi estas konforma al tiu dolĉa instruo, kiun ci konfesas, kaj due, ĉar mi faris ĝin por ci. Mi diros al ili morgaŭ, ke al ci ili ŝuldas la liberecon, ke ili estu al ci dankaj kaj glorucian nomon. Aliflanke mi sklavigas min mem al ci kaj al la feliĉo, kaj estu mi neniam liberigita! Malbenita estu Ancio kaj la vojaĝoj de Ahenobarbo. Trioble, kvaroble feliĉa mi estas, ke mi ne estas tiel saĝa, kiel Petronio, ĉar eble mi devus iri Aĥajon. Dume la memoro pri ci dolĉigados al mi la momentojn de la foresto. Kiomfoje mi povos liberiĝi, mi eksidos sur ĉevalon kaj rapidos en Romon por ĝojigi la okulojn per cia vido kaj la orelojn per cia dolĉa voĉo. Kiomfoje mi ne povos, mi sendos sklavon kun letero kaj demando pri ci. Mi salutas cin, dia, kaj ĉirkaŭprenas ciajn piedojn. Ne koleru, ke mi nomas cin dia. Poste, se ci malpermesos, mi obeos, sed hodiaŭ ankoraŭ mi ne kapablas nomi cin alie. Mi cin salutas el cia estonta domo — per la tuta animo.»

## Ĉapitro 36<sup>a</sup>

Oni sciis en Romo, ke Nerono volas viziti envoje Ostion, aŭ pli ĝuste la plej grandan ŝipon en la mondo, kiu estis ĵus alportinta grenon el Aleksandrio, kaj de tie li iros la Ĉebordan vojon<sup>254</sup> en Ancion. La ordonoj estis jam eldonitaj antaŭ kelkaj tagoj, tial de la mateno ĉe la pordego Ostia amasiĝadis aregoj, konsistantaj el la loka popolaĉo kaj el ĉiuj nacioj de la mondo por nutri la okulojn per la vido de la imperiestra sekvantaro; la Roma popolo neniam estis sata je tiu spektaklo.

La vojo al Ancio estis nek malfacila nek malproksima, kaj en la urbo mem, konsistanta el grandioze aranĝitaj palacoj kaj vilaoj, oni povis trovi ĉion, kion postulis la komforto kaj eĉ la plej elektema tiama lukso. Tamen Nerono kutimis kunpreni, vojaĝante, ĉiujn objektojn, kiujn li favoris, komencante de muzikaj instrumentoj kaj objektoj de la ĉiutaga uzo, finante per statuoj kaj mozaikoj, kiujn oni kunmetadis eĉ tiam, kiam li volis nur por mallonga momento halti envoje, ĉu por ripozi, ĉu por manĝi. Pro tio en ĉiu ekskurso akompanis lin grandaj aroj da servistoj, ne kalkulante pretorianajn taĉmentojn kaj aŭgustanojn, el kiuj ĉiu havis apartan sekvantaron da sklavoj.

---

<sup>254</sup> *Via Littoralis*. (Noto de la aŭtoro.)

En tiu tago frumatene paŝtistoj el Kampanio, vestitaj surfemure per kapraj feloj, kun vizaĝoj bruligitaj de la suno, trapelis unue tra la pordego kvincent azeninojn, por ke Popea povu la sekvantan tagon post la alveno en Ancion havi sian kutiman banon en ilia lakto. La popolaĉo kun rido kaj kontenteco rigardis la longajn orelojn de la bestoj balancantaj sin meze de polvaj nuboj kaj kun ĝojo aŭskultis la fajfadon de vipoj kaj sovaĝajn kriojn de la paŝtistoj.

Post la trapaso de la azeninoj aroj da servistoj kuris sur la vojon, kaj zorgeme ĝin puriginte, komencis ŝuti sur ĝin florojn kaj piniajn pinglojn. En la amaso oni ripetadis al si reciproke kun certa sento de fiereco, ke la tuta vojo, ĝis Ancio, estis tiel surŝutota per floroj, kiujn oni kolektis el privataj ĝardenoj en la ĉirkaŭaĵoj kaj aĉetis por alta prezo de vendistinoj ĉe la pordego Mugiona. Laŭgrade kiel la matenaj horoj pasadis, la amaso kreskis ĉiumomente. Kelkaj kunprenis eĉ siajn tutajn familiojn, kaj por ke la tempo ne ŝajnu al ili tro longa, ili dismetis manĝoprovizojn sur la ŝtonoj, destinitaj por novkonstruata templo de Cereso, kaj matenmanĝis sub la libera ĉielo. Aliloke formiĝis grupoj, en kiuj la ĉefan voĉon havis spertuloj. Okaze de la forveturo de la imperiestro oni interparolis pri liaj estontaj vojaĝoj kaj pri vojaĝoj ĝenerale; ĉe tio maristoj

kaj longeservintaj soldatoj rakontis mirindaĵojn pri la landoj, pri kiuj ili aŭdis en siaj malproksimaj serviroj, kaj en kiuj ne ekstaris ĝis nun piedo de romano. La urbanoj, kiuj neniam en la vivo estis ekster la Vojo Appia, aŭskultis kun admiro pri la mirindaĵoj de Hindujo kaj Arabujo, pri la insularoj, ĉirkaŭantaj Britujon, kie sur insulo priligoata de spiritoj Briareo<sup>255</sup> katenis la dormantan Saturnon; pri la Hiperboreaj landoj, pri glaciigintaj maroj, pri la siblado kaj muĝo, kiujn aŭdigis la akvoj de la oceano en la momento, kiam la subiranta suno profundiĝadis en la ondaron. Inter la popolaĉo facile trovis kredon similaj famoj, kiujn kredis eĉ tiaj homoj, kiel Plinio kaj Tacito. Oni ankaŭ rakontis pri tiu ŝipo, vizitota de la imperiestro, ke ĝi portas provizon de tritiko por du jaroj, ne kalkulante kvarcent vojaĝantojn, samnombran ŝipanaron kaj multege da sovaĝaj bestoj, uzotaj en la someraj cirkoludoj. Tio elvokadis ĝeneralan simpation por la imperiestro, kiu ne nur nutris, sed ankaŭ amuzis la popolon. Oni do preparis sin por fervora salutado.

Dume aperis taĉmento da numidaj rajdistoj, apartenantaj al la pretoria militistaro. Ili estis vestitaj per flavaj vestoj, ruĝaj zonoj kaj grandegaj orelingoj, ĵetantaj orajn brilojn sur iliajn nigrajn vizaĝojn. La pintoj de iliaj bam-

<sup>255</sup> «**Briareo** (mit.) Centbraka giganto» [PIV].

buaj lancoj brilis en la suno, kiel flametoj. Post ilia trapaŝo komenciĝis irado, simila al procesio. La amasoj premis sin por rigardi la irantaron de pli proksime, sed alvenis taĉmentoj da piedaj pretorianoj kaj, viciĝinte laŭlonge ĉe ambaŭ flankoj de la pordego, baris alpaŝon al la vojo. Antaŭe iris veturiloj portantaj tendojn el purpuro, ruĝajn kaj violkolorajn, kaj tendojn el neĝblanka bisino, trateksita per oraj fadenoj, kaj orientajn tapiŝojn, kaj citronlignajn tablojn, kaj pecojn da mozaikoj, kaj kuirejajn vazojn, kaj kaĝojn kun birdoj el Oriento, Sudo kaj Okcidento, kies langoj aŭ cerboj estis destinitaj sur la imperiestran tablon, kaj amforojn kun vino, kaj korbojn kun fruktoj. Sed la objektojn, kiuj povus suferi fleksiĝon aŭ rompiĝon en la veturiloj, portis piedirantaj sklavoj. Oni vidis centojn da homoj, portantajn vazojn kaj statuetojn el korinta kupro; oni vidis apartajn sklavojn kun etrusiaj vazoj, apartajn kun la grekaj, apartajn kun ujoj oraj, arĝentaj aŭ faritaj el aleksandria vitro. Dividis ilin malgrandaj taĉmentoj da pretorianoj piedaj kaj rajdaj, kaj ĉiun grupon da sklavoj estris gardistoj, armitaj per vipoj, finitaj per pecoj da plumbo kaj fero, anstataŭ la klakŝnuroj. La irantaro, konsistanta el homoj, portantaj kun atento kaj zorgema respekto diversajn objektojn, aspektis kvazaŭ ia solena religia procesio, kaj tiu simileco iĝis ankoraŭ pli klara, kiam

oni komencis porti muzikajn instrumentojn de la imperiestro kaj de la kortego. Oni vidis tie harpojn, liutojn grekajn, liutojn hebreajn kaj egiptajn, lirojn, formingojn<sup>256</sup>, citrojn, ŝalmojn, longajn fleksformajn kornojn kaj cimbalojn. Rigardante tiun maron da instrumentoj, brilantaj en la suno de oro, bronzo, multekostaj ŝtonoj kaj perlamoto, oni povus kredi, ke Apolono aŭ Bakĥo ekvojaĝas en la mondon. Poste aperis luksaj ĉaroj, plenaj je akrobatoj, dancistoj, dancistinoj, ariĝintaj en pentrindajn grupojn, kun tirsoj en la manoj. Post ili veturis sklavoĵ, destinitaj ne por servo, sed por lukso, nome knabetoj kaj malgrandaj knabinoj, elektitaj en la tuta Grekujo kaj Anatolio, longharaj aŭ kun volviĝantaj bukloj, tenataj per oraj retoj, similaj al amoroj, kun vizaĝoj belegaj, sed tute kovritaj per dika tavolo da kosmetikaĵoj, por ke la vento de Kampanio ne brunigu iliajn delikatajn haŭtojn.

Kaj denove sekvis pretoriana taĉmento, konsistanta el grandegaj sikambroj<sup>257</sup>, barbohavaĵ, bluokulaj, kun haroj helaj aŭ ruĝetaj. Antaŭ ili standardistoj, nomataj *imaginarii*, portis la romajn aglojn, tabulojn kun surskriboj, statuetojn de la dioj ĝermanaj kaj romaj, fine statuetojn kaj

<sup>256</sup> **formingo**, gr. φόρμιγγς — malnovgreka korda muzikilo, praa formo de liro.

<sup>257</sup> Ĝermana aŭ kelta popolo kiu loĝis ĉe la rivero Sigo (germane *Sieg* [zi:k]), dekstra alfluanto de Rejno.

bustojn de Nerono. El sub iliaj feloj kaj soldataj kirasoj videblaj estis brakoj sunbrunaj kaj fortaj, kiel batalmaŝinoj, kapablaj uzi la pezajn armilojn, per kiuj estis armitaj tiaj gardistaroj. La tero ŝajnis tremi sub iliaj egalaj, pezaj paŝoj, kaj ili, kvazaŭ konsciaj pri sia forto, kiun ili povis uzi kontraŭ la imperiestroj mem, fiere rigardis la stratan amason, forgesante videble, ke multaj el ili venis tiun ĉi Urbon en katenoj. Sed ili estis en malgranda aro, ĉar la ĉefaj pretoriaj fortoj restis en la tendoj loke por gardi la ordon kaj disciplinon en la Urbo. Kiam ili pasis, oni kondukis la jungeblajn tigrojn kaj leonojn de Nerono, por ke, se ekplaĉos al li imiti Dionizon, oni povu jungi ilin al procesiaj veturiloj. Hindoj kaj araboj kondukis ilin per ŝtalaj, bantfinitaj ĉenoj, tiel tamen ĉirkaŭvolvitaj per floroj, ke ili ŝajnis plektitaj el solaj floroj. La bestoj, malsovaĝigitaj de *bestistoj*, rigardis la amasojn per siaj verdaj, kvazaŭ dormemaj okuloj, kaj iafoje, levante la grandegajn kapojn, avide sorbis per la nazoj la homan ŝvitodoron, ĉirkaŭlekante la buŝegojn per siaj malglataj langoj.

Sekvis ankoraŭ imperiestraj veturiloj kaj portiloj, pli kaj malpli grandaj, inkrustitaj per eburo, perloj, aŭ riĉaj je brilo de juveloj; post ili denove iris malgranda taĉmento da pretorianoj, romane vestitaj, konsistanta ekskluzive el italaj soldatoj-volontuloj<sup>258</sup>; denove amaso da eleganta

sklava servistaro kaj knabetoj, kaj fine veturis la imperiestro mem, kies proksimiĝon anoncis de malproksime krido de la popolo.

En la stratamaso estis ankaŭ Petro la apostolo, kiu de ziris unufoje en la vivo vidi la imperiestron. Akompanis lin Ligia, kun vizaĝo kaŝita sub densa vualo, kaj Urso, kies forto estis por la knabino plej certa gardo meze de la malmodera kaj senbrida amaso.

La ligio prenis en la manojn unu el la ŝtonegoj, destinitaj por la konstruata templo, kaj alportis ĝin al la apostolo, por ke tiu ĉi, surpaŝinte la ŝtonon, vidu pli bone ol la aliaj. La amaso unue komencis murmuri, ĉar Urso disŝovadis ĝin, kiel ŝipo disŝovas la ondojn, kiam tamen li sola levis la ŝtonegon, kiun kvar plej bravaj fortuloj el la popolo ne kapablus eĉ movi, la murmurado ŝanĝis sin en admiron kaj la ekkrioj «*macte!*»<sup>259</sup> aŭdiĝis ĉiuflanke.

Sed dume alvenis la imperiestro. Li sidis en veturilo havanta la formon de tendo, tirata de ses blankaj idumeaj virĉevaloj kun oraj hufaĵoj. La veturilo havis la formon de tendo kun speciale malfermitaj flankoj, por ke la amasoj povu vidi la imperiestron. Estis tie sufiĉe da loko por

<sup>258</sup> La loĝantoj de Italujo estis ankoraŭ de Aŭgusto liberigitaj de militservo, pro kio la t.n. *cohors Italica*, postenanta ordinare en Azio, konsistis el volontuloj. Ankaŭ en la pretoria gardistaro, se ĝi ne konsistis el alilandanoj, servis volontuloj. (*Noto de la aŭtoro.*)

<sup>259</sup> Voĉlegu [makte] — latina interjekcio responda al la moderna «Brave!».



kelkaj personoj, sed Nerono, volante, ke la atento koncentriĝu ekskluzive je li, veturis tra la Urbo sola, havante nur ĉe la piedoj du degenerintajn pigmeojn. Li estis vestita per blanka tuniko kaj ametista togo, kiu ĵetadis violbluan brilon sur lian vizaĝon. De la tempo de la vojaĝo en Neapolon li rimarkinde dikiĝis. Lia vizaĝo grasŝvelis; de sub la malsupra makzelo pendis duobla mentono, pro kio la buŝo, ĉiam tro proksima al la nazo, ŝajnis nun malfermiĝi tuj sub la naztruoj. La dikan kolon li vualis, kiel ordinare, per silka tuko, kiun li ĉiumomente bonigadis sur si per mano blanka kaj dika, kovrita sur la artikoj de ruĝaj haroj, formantaj kvazaŭ sangajn makulojn. Li tamen ne permesis al *epilatoroj* elŝiri tiujn harojn, ĉar oni diris al li, ke tio kaŭzas tremadon de la fingroj kaj malhelpas liutludadon. Senfunda vanteco bildis sin, kiel ordinare, sur lia vizaĝo, kun kaj laceco kaj enuo. Ĝenerale ĝi estis vizaĝo kune terura kaj arlekenaĉa. Veturante, li turnadis ambaŭflanken la kapon, duonfermante momente la okulojn kaj atente aŭskultante, kiel oni lin salutas.

Salutis lin fulmotondro da aplaŭdoj kaj la ekkrioj: «Saluton, dia! Saluton, Cezaro, imperiestro, ĉiovenkanto! Saluton, senkompara – filo de Apolono, Apolono!»

Aŭskultante tiujn vortojn li ridetadis, sed iafoje trakuris lian vizaĝon kvazaŭ nubo, ĉar la Roma popolo estis

mokema kaj, sentante sin sekura pro la granda nombro, ĝi permesadis al si mokajn ŝercojn eĉ kontraŭ grandaj triumfantoj, kontraŭ tiuj, kiujn ĝi efektive amis kaj estimis. Oni ja sciis, ke iam oni kriis dum la enveturo de Julio Cezaro en Romon: «Civitanoj, kaŝu viajn edzinojn, ĉar enveturas kalva diboĉulo!» Sed la monstra memamo de Nerono ne toleris eĉ plej etajn riproĉojn, nek mokojn, dume en la amaso, inter la laŭdaj ekkrioj, aŭdiĝadis la voĉoj: «Kuprobarba!... Kuprobarba! Kien ci portas cian flaman barbon? Ĉu ci timas, ke Romo de ĝi ekflamos?»

Kaj tiuj, kiuj tiel kriis, ne sciis, ke ilia ŝerco entenas teruran profetaĵon. Neronon cetere ne tre kolerigis similaj voĉoj, tiom pli, ke li ne havis barbon, ĉar jam antaŭe li oferis ĝin en ora skatolo al Jovo Kapitola. Sed aliaj, kaŝitaj post la amaso da ŝtonegoj kaj ĉe la angulo de la templo, vokis: «Patrinmurdinto! Nerono! Oresto! Alkmeono!» kaj aliaj: «Kie estas Oktavia?» «For la purpuron!». Popean, kiu veturis tuj poste, oni salutis per la krioj: «*flava coma!*»<sup>145</sup>; per tiu esprimo oni nomis stratulinojn. La muzikema orelo de Nerono kaptadis ankaŭ tiajn ekkriojn, kaj tiam li levadis per la fingroj sian poluritan smeraldon al la okulo, kvazaŭ volante ekvidi kaj fiksi en la memoro tiujn, kiuj ilin eligis. Tiamaniere lia rigardo haltis momente sur la

<sup>145</sup> Latine *flava coma* (laŭvorte «blonda hararo», pli poezie «orharulino») estis esprimo aludanta facilmoran virinon.

apostolo, staranta sur la ŝtonego.

Dum momento tiuj du homoj rigardis unu la alian, kaj en tiu tuta brila sekvantaro, en tiuj sennombraj amasoj neniu ekpensis, ke ĉi-minute rigardas unu la alian du regantoj de la tero, el kiuj unu baldaŭ pasos, kiel sanga sonĝo kaj la alia, tiu maljunulo, vestita per simpla mantelo, prenos en eternan posedon la mondon kaj la Urbon.

Dume la imperiestro traveturis, kaj tuj post li du afrikanoj portis grandiozan portilon, en kiu sidis Popea, malamegata de la popolo. Vestita, kiel Nerono, per ametistokolora vesto, kun dika tavolo da kosmetikaĵoj sur la vizaĝo, senmova, enpensiĝinta kaj indiferenta, ŝi aspektis kiel iu diino, kune belega kaj malbona, kiun oni portis kvazaŭ en procesio. Post ŝi sekvis denove kortego da vira kaj virina servistaro kaj vicoj da veturiloj kun instrumentoj de komforto kaj eleganteco.

La suno jam estis delonge deirinta de la zenito, kiam komenciĝis traveturado de la aŭgustanoj — vicaro impona, brila, sangkolora, kiel serpento, kaj senfina. La maldiligenta Petronio, favore salutata de la amasoj, igis sin porti en portilo kune kun sia diinsimila sklavino. Tigeleno veturis en kaleŝo tirata de malgrandaj ĉevaloj ornamitaj per blankaj kaj purpuraj plumoj. Oni vidis, kiel li leviĝadis en la veturilo kaj, etendante la kolon, rigardadis atente,

ĉu Nerono donos al li la signon translokiĝi apuden. El la aliaj la amasoj salutis per aplaŭdoj Licinianon Pizonon<sup>260</sup>, per rido Vitelion, per fajfado Vatinion. Al Licinio kaj Le-kanio, la konsuloj, oni sin tenis indifere, sed Tulio Seneciono, kiun la popolo amis, oni ne scias pro kio, ankaŭ, same kiel Vesteno, ricevis aplaŭdojn de la amaso.

La kortego estis sennombra. Ŝajnis, ke ĉiu, kiu disting-igis en Romo per riĉeco, brilo aŭ eminenteco, elmigras en Ancion. Nerono neniam vojaĝis alie ol kun mil veturiloj, kaj la taĉmento de liaj akompanantoj preskaŭ ĉiam superis la nombron de soldatoj en legio<sup>261</sup>. Oni do montradis al si reciproke Domicion Afron, kaj la kadukan Lucion Saturnenon; oni vidis Vespazianon, kiu ne estis ankoraŭ militirinta en Judeon, el kie li poste revenis nur por meti sur la kapon la imperiestran kronon, kaj liajn filojn, kaj la junan Nervon, kaj Lukanon, kaj Aneon Galionon<sup>262</sup>, kaj Kvintianon<sup>263</sup> kaj multegajn virinojn, famajn pro sia riĉ-

<sup>260</sup> «**Pizono**. Familia nomo de pluraj Romaj politikistoj» [NPIV] (lat. *Piso*)

<sup>261</sup> En la tempo de la imperio legio kalkulis pli ol 12.000 homojn. (*Noto de la aŭtoro.*)

<sup>262</sup> **M. Annæus Gallio** — frato de Seneko, menciita en la *Agoj*, 18:12 (esperantigita per *Galiono* en la Londona Biblio). La kunnomon *Gallio*, *-onis* li ricevis post kiam lin adoptis la retoro *L. Junius Gallio*. Sin mortigis en 65 p.K. (Senkeviĉo skribis akuzative *Anniusza Gallona* kio ĉe Lidja Z iĝis *Anniusson Galon.*)

<sup>263</sup> **Afranius Quintianus** — senatano, ekzekutita pro partopreno en la Pizona konspiro.

eco, beleco, lukso aŭ malĉasto.

La rigardo de la amaso transportadis sin de la konataj vizaĝoj al la jungilaro, veturiloj, ĉevaloj, strangaj vestoj de la servistaro, konsistanta el ĉiuj nacioj de la mondo. En tiu inundo de lukso kaj grandeco oni ne sciis, kion rigardi, kaj ne nur la okuloj, sed ankaŭ la penso blindiĝadis pro tiuj oraj fulmaĵoj, pro tiuj koloroj purpuraj kaj violaj, pro flagrado de multekostaj ŝtonoj, pro brilo de vitornamoj, perlamoto, eburo. Ŝajnis, ke la sunradioj mem sorbiĝadis en tiun brilan ondaron. Kaj kvankam en la popolamaso ne mankis mizeruloj kun kavaj ventroj kaj malsato en la okuloj, tamen tiu spektaklo ekscitis en ili ne nur ĝudeziron kaj envion, sed ankaŭ inspiris ravon kaj fierecon, donante la senton de tiu povo kaj nevenkebleco de Romo, kiun formis kaj antaŭ kiu genuis la tuta mondo. Efektive, en la tuta mondo estis neniu, kiu aŭdacus ekpensi, ke tiu potenco ne daŭros tra ĉiuj jarcentoj, ne postvivos ĉiujn naciojn de la mondo kaj ke io sur la tero povos ĝin kontraŭstari.

Vinicio, veturanta en la fino de la korteganaro, ĉe la vido de la apostolo kaj de Ligia, kiujn li ne esperis renkonti, elsaltis el la veturilo kaj, salutinte ilin kun radiantaj vizaĝoj, komencis paroli per rapida voĉo, kiel homo, kiu ne havas tempon por perdi:

— Ĉu ci venis? Mi ne scias, kiel danki cin, ho Ligia! ... Dio ne povis sendi al mi pli bonan antaŭsignon. Mi salut-  
as cin refoje, adiaŭante, sed mi ne adiaŭas cin por longe.  
Envoje mi dislokis partajn ĉevalojn kaj en ĉiu libera tago  
mi estos apud ci, antaŭ ol mi elpetos permeson de reveno.  
Restu en sano!

— Restu en sano, Marko, — respondis Ligia kaj poste  
aldonis pli mallaŭte:

— Kristo cin gvidu kaj malfermu cian animon al la  
vortoj de Paŭlo.

Kaj li ekĝojis en la koro, vidante ŝian deziron, ke li  
baldaŭ iĝu kristano, do li respondis:

— *Ocelle mi!* Estu tiel, kiel ci parolas. Paŭlo preferas  
veturi inter miaj sklavoj, sed li estas kun mi, kaj li estos  
mia majstro kaj kunulo ... Levu la vualon, mia ĝojo, ke mi  
ankoraŭ ekvidu cin antaŭ la vojaĝo. Kial ci cin tiel kovris?

Ŝi levis per la mano la vualon kaj montris al li sian he-  
lan vizaĝon kaj la mirindajn, ridantajn okulojn, demand-  
ante:

— Ĉu tio malplaĉas al ci?

Kaj ŝia rideto enhavis iom da knabina koketemo, sed  
Vinicio, rigardante ŝin kun ravekscito, respondis:

— Tio malplaĉas al miaj okuloj, kiuj volus ĝis la morto  
rigardi cin solan.

Poste li sin turnis al Urso kaj diris:

— Urso, gardu ŝin kiel la pupilon de cia okulo, ĉar ŝi estas ne nur cia, sed ankaŭ mia — *domina!*

Dirinte tion, li kaptis ŝian manon kaj premis al ĝi la buŝon, je granda mirego de la stratamaso, kiu ne povis kompreni tian signon de respekto flanke de la brila aŭgustano al la knabino, vestita per simpla, preskaŭ sklavina vesto.

— Restu en sano ...

Poste li rapide foriris, ĉar la tuta imperiestra sekvantaro jam estis konsiderinde antaŭeniĝinta. La apostolo Petro benis lin nerimarkeble per la signo de kruco, kaj la bona Urso komencis lin tuj laŭdi, kontenta, ke lia juna mastrino aŭskultas avide kaj rigardas lin kun dankemo.

La sekvantaro foriĝadis kaj vualiĝadis per nuboj da ora polvo, sed ili rigardis post ĝi longe ankoraŭ, ĝis proksimiĝis al ili Demaso, la sama, ĉe kiu Urso laboradis nokte.

Tiu ĉi, kisinte la manon de la apostolo, komencis lin peti, ke ili venu al li por manĝi, dirante, ke lia domo estas proksime al Emporio, kaj ili estas sendube malsataj kaj lacaj, pasiginte pliparton de la tago ĉe la pordego.

Ili do iris kune kaj, ripozinte kaj satiĝinte en lia domo, nur antaŭ la vespero reiris al Transtibero. Intencante tra-

pasi la riveron per la ponto Emilia<sup>264</sup>, ili iris tra la Deklivo Publika, kondukanta tra la mezo de Aventino, inter la temploj de Diano kaj Merkuro. La apostolo Petro rigardis de la altaĵo la konstruaĵojn, lin ĉirkaŭantajn kaj pli malproksimajn, nebuliĝantajn en la distanco, kaj profundiĝinte en silenton, li meditis pri la grandeco kaj potenco de tiu ĉi urbo, en kiun li venis prediki la vorton de Dio. Ĝis nun li vidadis la roman regadon kaj la legiojn en diversaj landoj, tra kiuj li migris, sed tio estis kvazaŭ apartaj membroj de tiu potenco, kies enkorpigon en la persono de Nerono li ekvidis hodiaŭ unuafoje. Tiu ĉi urbo senlima, rabema, avida kaj senbrida, putrinta ĝis la ostoj kaj kune nekuebla en sia superhoma forto, tiu imperiestro, fratmurdinto, patrinmurdinto kaj edzinmurdinto, post kiu trenis sin aro da sangaj fantomoj, ne malpli granda ol lia kortego, tiu diboĉulo, arlekeno kaj kune reganto de tridek leĝoj kaj pere de ili de la tuta tero, tiuj korteganoj, kovritaj per oro kaj skarlato, necertaj pri la morgaŭa tago kaj kune pli povohavaj ol reĝoj — ĉio tio kune ekŝajnis al li ia infera regno de malbono kaj maljusteco. Kaj li ekmiris en sia simpla koro, kiel Dio povas doni tiel nekompreneblan ĉiopovon al Satano, kiel li povas doni al li la teron, ke li ĝin piedpremu, renversu, tretu, elpremadu larmojn kaj

<sup>264</sup> *Pons Æmilius* — la plej malnova ŝtona ponto de Romo, de kiu nun postrestas nur unu arko (itale *Ponte Rotto*).



sangon, konfuzu, kiel uragano, detruu, kiel fulmotondro, kaj bruligu, kiel fajro. Kaj de tiuj ĉi pensoj timo ekregis lian apostolan koron kaj li komencis paroli interne al la Majstro: «Sinjoro, kion mi faru kontraŭ tiu ĉi urbo, kien ĉi min sendis? Al ĝi apartenas la maroj kaj la kontinentoj, al ĝi apartenas la bestoj sur la tero kaj la maraj kreaĵoj, al ĝi apartenas aliaj regnoj kaj urboj kaj tridek legioj, kiuj ilin gardas, kaj mi, Sinjoro, mi estas laga fiŝkaptisto! Kion mi faru, kaj kiel mi venku ĝian malbonpovon?»

Tiel parolante, li levadis sian grizan, tremantan kapon al la ĉielo, preĝante kaj vokante el la fundo de la koro al sia Dia Majstro, plena je malĝojo kaj teruro.

Subite lian preĝon interrompis la voĉo de Ligia, kiu diris:

— La tuta urbo kvazaŭ flamas...

Efektive, la suno tiutage estis strange subiranta. Ĝia grandega disko jam kaŝis sin duone post Janikulo, kaj la tuta ĉielspaco pleniĝis per ruĝa brilo. De la loko, kie ili staris, antaŭ iliaj okuloj malkaŝis sin vastaj spacoj. Iom dekstre ili vidis la longformajn murojn de *Circus Maximus*, super ili la tavolo levitajn palacojn de Palatino, kaj rekte antaŭ si, trans la Bova Forumo kaj Velabro<sup>265</sup>, la supron de Kapitolo kun la templo de Jovo. Sed la muroj, la kolor-

<sup>265</sup> Komerca kvartalo inter Kapitolo kaj Palatino (lat. *Velabrum*).

oj kaj la suproj de la temploj estis kvazaŭ dronantaj en tiu ora kaj purpura brilo. La partoj de la rivero videblaj de malproksime ŝajnis fluigi sangon, kaj laŭgrade, kiel la suno malsupreniĝadis post la altaĵon, la brilo iĝadis ĉiam pli skarлата, ĉiam pli simila al brulruĝo, ĝi kreskis, vastiĝadis, fine ĝi etendis sin sur la sep montetojn, de kiuj ĝi ŝajnis flui malsupren sur la tutan ĉirkaŭaĵon.

— La tuta urbo kvazaŭ flamas, — ripetis Ligia.

Kaj Petro ŝirmis la okulojn per la mano kaj diris:

— La kolero de la Sinjoro estas super ĝi.

## Ĉapitro 37<sup>a</sup>

Vinicio al Ligia:

*«Flegono, la sklavo, per kiu mi sendas al ci ĉi tiun leteron, estas kristano, li do estas unu el tiuj, kiuj ricevos liberecon el ciaj manoj, mia plej kara. Li estas delonga servisto de nia domo, do mi povas sendi per li tiun ĉi leteron kun plena fido, sen la timo, ke ĝi trafos en aliajn manojn ol ciaj. Mi skribas el Laŭrento<sup>266</sup>, kie ni haltis pro la varmego. Otono posedis ĉi tie luksan vilaon, kiun li siatempes donacis al Popea, kaj ŝi, kvankam eksedziniĝinta je li, opiniis konvena reteni la belegan donacon ...*

<sup>266</sup> **Laŭrento** (latine *Laŭrentum*) — antikva marborda havenurbo de la regiono Latio, sudoriente de Ostio.

*Kiam mi pensas pri tiuj virinoj, kiuj min nun ĉirkaŭas, kaj pri ci, ŝajnas al mi, ke el la ŝtonoj de Deŭkaliono<sup>267</sup> naskiĝis videble diversaj specoj de homoj, malsimilaj unuj al la aliaj, kaj ke ci apartenas al tiu, kiu naskiĝis el kristalo. Mi cin admiras kaj amas per la tuta animo, tiel ke mi volus skribi al ci nur pri ci mem, kaj necesas al mi regi min por skribi pri la vojaĝo, pri tio, kio al mi okazas kaj pri la kortegaj novaĵoj.*

*Nerono estis do gasto de Popea, kiu sekrete antaŭ li preparis luksan akcepton. Ŝi invitis cetere nemultajn aŭgustanojn, sed same mi, kiel Petronio, ricevis la alvokojn. Post la matenmanĝo ni naĝis per oraj boatoj sur la maro, kiu estis tiel trankvila, kvazaŭ ĝi dormus, kaj tiel blua, kiel ciaz okuloj, ho mia dia! Ni remis mem, ĉar videble flatis al la aŭgustino, ke ŝian boaton remas ekskonsuloj, aŭ iliaj filoj. Nerono, starante ĉe la direktilo, en purpura togo, kantis himnon al la maro, kiun li verkis la antaŭan nokton kaj al kiu li komponis muzikon kune kun Diodoro. El aliaj boatoj akompanis lin sklavoj el Hindujo, kiuj scias ludi per maraj konk-oj, kaj ĉirkaŭe elaperadis multaj delfenoj, kvazaŭ efektive logitaj per la muziko el la profundaĵoj de Amfitrito. Kaj mi — ĉu ci scias, kion mi faris? Mi pensis pri ci kaj sopiris al ci, kaj mi volus preni*

<sup>267</sup> **Deŭkaliono** [PIV] (mit. gr.) — filo de Prometeo, kiu por rekrei la homaron ĵetadis malantaŭ sin ŝtonojn, el kiuj leviĝis homoj.

tiun ĉi maron kaj tiun ĉi belveteron kaj tiun ĉi muzikon kaj ĉion tion oferi al ci. Ĉu ci volas, ke ni loĝu iam ĉe marbordo, for de Romo, mia aŭgustino? Mi havas en Sicilio posedaĵon kun migdala arbaro, kiu printempe floras rozkolora kaj venas tiel proksimen al la maro, ke la finoj de la branĉoj preskaŭ tuŝas la akvon. Tie mi amos cin kaj adoros tiun instruon, kiun Paŭlo al mi konigos, ĉar mi jam scias, ke ĝi ne kontraŭas al la amo kaj al la feliĉo. Ĉu ci volas? Sed antaŭ ol mi aŭdos la respondon el cia amata buŝo, mi skribas al ci plue, kio okazis en la boato.

Kiam la bordo restis jam for post ni, ni ekvidis malproksime antaŭ ni velon, kaj tuj estiĝis diskuto, ĉu ĝi estas fiŝkaptista boato aŭ granda ŝipo el Ostio. Mi distingis ĝin la unua; tiam la aŭgustino diris, ke por miaj okuloj nenio videble estas sekreta, kaj, mallevente subite vualon sur la vizaĝon, demandis, ĉu eĉ tiel mi ŝin rekonus, Petronio tuj respondis, ke trans nuboj oni eĉ la sunon ne povas ekkoni, sed ŝi, kvazaŭ ridetante, diris, ke tiel akrajn okulojn nur amo sola povus blindigi, kaj nomante diversajn aŭgustaninojn, komencis demandi kaj divenadi, kiun mi amas. Mi respondadis trankvile, sed ŝi diris fine ankaŭ cian nomon. Mi sentas veran dankemon al Petronio, kiu ĉi-momente ekŝancelis la boaton, pro kio la ĝenerala atento estis deturnita de mi, ĉar se mi ekaŭdus pri ci malafab-

*lajn aŭ mokajn vortojn, mi ne scius kaŝi la koleron kaj devus batali kontraŭ la deziro frakasi per la remilo la kapon de tiu malica kaj malbona virino ... Ci ja memoras, kion mi rakontis al ci en la domo de Lino, antaŭtage de la forveturo, pri la okazo sur la Agripa lago?*

*Petronio timas pri mi kaj eĉ hodiaŭ li insistegis, ke mi ne incitu la memamon de la aŭgustino. Sed Petronio min ne plu komprenas kaj ne scias, ke ekster ci ekzistas por mi nenia volupto, nek belo, nek amo, kaj ke al Popea mi havas sole abomenon kaj malestimon. Ci jam tre ŝanĝis mian animon, kaj tiagrade, ke al la antaŭa vivo mi eĉ ne scipovus plu reveni. Sed ne timu, ke ĉi tie povas okazi al mi io malbona. Popea min ne amas, ĉar ŝi kapablas neniun ami, kaj la fonto de ŝiaj ekdeziroj estas nur kolero kontraŭ Nerono, kiu estas ankoraŭ sub ŝia influo kaj kiu ŝin eble amas ankoraŭ, tamen li ne ŝparas ŝin plu kaj ne kaŝas de ŝi sian senhontecon kaj siajn malbonagojn.*

*Mi diros al ci cetere ankoraŭ ion, kio devas cin trankviligi: jen Petro diris al mi antaŭ la forveturo, ke mi ne timu la imperiestron, ĉar eĉ unu haro ne falos de mia kapo, kaj mi kredas al li. Ia interna voĉo diras al mi, ke ĉiu lia vorto devas plenumiĝi, kaj ĉar li benis nian amon, tial nek Nerono, nek ĉiuj potencoj de Hadeso, nek eĉ Fato mem kapablos cin rabi de mi, ho Ligia! Kiam mi pensas*

*pri tio, mi estas feliĉa kaj trankvila. Sed cin, kristaninon, eble ofendas tio, kion mi diras pri la ĉielo kaj pri Fato? Tiuokaze pardonu min, ĉar mi pekas senvole. Bapto ne lavis min ankoraŭ, sed mia koro estas kiel malplena pokalo, kiun Paŭlo el Tarso plenigos per la dolĉa kristana instruo por mi tiom pli dolĉa, ke ĝi estas cia. Ci, mia dia, kalkulu al mi kiel meriton tion almenaŭ, ke el tiu pokalo mi elverŝis la fluidaĵon, kiu ĝin antaŭe plenigis, kaj ke mi ĝin ne retiras, sed etendas, kiel soifanto, ekstarrinta ĉe pura fonto. Mi trovu favoron antaŭ ciaj okuloj.*

*En Ancio mi pasigados tagojn kaj noktojn aŭskultante Paŭlon, kiu inter miaj servistoj jam en la unua tago de la vojaĝo akiris tian influon, ke ili ĉirkaŭas lin senĉese, vidante en li ne nur miraklofaranton, sed preskaŭ supernaturan estaĵon. Mi vidis hieraŭ ĝojon sur lia vizaĝo, kaj kiam mi demandis, kion li faras, li respondis: „Mi semas“. Petronio scias, ke li estas inter miaj servistoj kaj deziras lin vidi, same kiel Seneko, kiu aŭdis pri li de Galiono. Sed jam la steloj paliĝas, ho Ligia, kaj la matena lucifer<sup>268</sup> brilas ĉiam pli lume. Baldaŭ la matenruĝo verŝos sian koloron sur la maron — kaj dormas ĉio ĉirkaŭe, nur mi pensas pri ci kaj*

<sup>268</sup> Latine «lumportanta» (interalie, nomepiteto de la planedo Venero). Senkeviĉo skribis la vorton minuskle, virgenre, kaj inter citiloj — ĉu aludante la Klementan Vulgaton, Jes. 14:12, kie ĝi aperas same minuskle?

*amas cin. Mi salutas cin kun la matenlumo, sponsa mea!*<sup>269</sup>»

## Ĉapitro 38<sup>a</sup>

Vinicio al Ligia:

«Ĉu ci estis iam kun la Plaŭcioj en Ancio, kara mia? Se ne, mi estos feliĉa, kiam mi ĝin al ci montros. Jam de Laŭrento etendas sin laŭlonge de la bordo vilaoj, unu post la alia, kaj Ancio mem estas senfina vico da palacoj kaj portikoj, kies kolonoj dum belvetero spegulas sin en la akvo. Ankaŭ mi havas ĉi tie, apud la akvo, posedaĵon kun olivarbaro kaj cipresaro post la vilao, kaj kiam mi pensas, ke tiu posedaĵo iĝos iam cia, pli blankaj ŝajnas al mi ĝiaj marmoroj, pli ombroriĉaj la ĝardenoj kaj pli lazura la maro. Ho Ligia, kiel bone estas vivi kaj ami! La maljuna Meniklo, kiu administras ĉi tie mian vilaon, plantis sur herbejoj, sub mirtoj, tutajn tufojn da iridoj; kaj ĉe ilia vido mi rememoris la domon de Aŭlo, vian pluvujon kaj vian ĝardenon, en kiu mi sidadis apud ci. Ankaŭ al ci tiuj iridoj rememorigados la gepatran domon, tial mi certas, ke ci amos Ancion kaj ĉi tiun vilaon. Tuj post la alveno mi longe parolis kun Paŭlo ĉe la tagmanĝo. Ni parolis pri ci, poste li komencis min

<sup>269</sup> sponsa mea (lat.) — fianĉino mia.

*instrui, kaj mi aŭskultis longe, kaj nur tion mi dir-  
os al ci, ke eĉ se mi scius tiel skribi, kiel Petronio,  
eĉ tiam mi ne scipovus konigi al ci ĉion, kio traku-  
ris mian penson kaj animon. Mi ne esperis, ke po-  
vas esti ankoraŭ en la mondo tia feliĉo, belo kaj  
trankvilo, pri kiuj la homoj ĝis nun ne scias. Sed  
ĉion tion mi rezervas por interparolo kun ci, kiam  
en unua libera momento mi alvenos Romon.*

*Diru al mi, kiamaniere la tero povas surteni kune  
tiajn homojn, kiel Petro la apostolo, kiel Paŭlo el  
Tarso — kaj Nerono? Mi demandas tial, ke la ves-  
peron post la instruado de Paŭlo mi pasigis ĉe Ne-  
rono, kaj ĉu ci scias, kion mi tie aŭdis? Jen unue li  
legis al ni sian poemon pri la detruo de Trojo, kaj  
komencis plendi, ke li neniam vidis brulantan urb-  
on. Li enviis Priamon kaj nomis lin feliĉulo ĝuste  
tial, ke li povis rigardi la brulegon kaj pereon de  
sia naskiĝa urbo. Je tio Tigeleno ekparolis: „Diru  
unu vorton, dia, tiam mi prenos torĉon, kaj antaŭ  
ol la nokto pasos, ci ekvidos brulantan Ancion.“  
Sed Nerono nomis lin stultulo. „Kien mi venad-  
us,“ — li diris, — „por spiri la maran aeron kaj  
flegi tiun ĉi voĉon, kiun la dioj al mi donacis kaj  
pri kiu, kiel oni diras, mi devas zorgi por la bono  
de la popolo? Ĉu ne Romo min malsanigas, ĉu ne  
la sufokaj odoroj el Suburo kaj Eskvilino igas min  
raŭka, kaj ĉu brulanta Romo ne prezentus centoble  
pli grandiozan kaj pli tragikan vidaĵon ol brulanta*



Ancio?“ Ĉe tio ĉiuj komencis paroli, kiel senkompara tragedio estus la bildo de la Urbo, kiu konkeris la mondon, ŝanĝita en amason da cindroj. Nerono deklaris, ke tiam lia poemo superus la kantojn de Homero, poste li komencis paroli, kiel li rekonstruus la Urbon kaj kiel la sekvontaj generacioj devus admiri lian verkon, kompare kun kiu malgrandaj ŝajnus ĉiuj aliaj homaj verkoj. Tiam la ebriaj festenanoj komencis krei: „Faru tion! Faru tion!“ al kio li diris: „Mi devus havi pli fidelajn kaj pli sindonajn amikojn“.

Mi konfesas, ke aŭdante tion, mi komence maltrankviliĝis, ĉar en Romo estas ci, carissima. Mi mem priridas nun tiun timon kaj mi pensas, ke Nerono kaj la aŭgustanoj, kiel ajn frenezaj ili estas, similan frenezajon ne kuraĝus plenumi. Tamen vidu, kiel oni timas pri tiu, kiun oni amas — tamen mi preferus, ke la domo de Lino ne staru en mallarĝa transtibera strateto, en kvartalo okupata de fremda loĝantaro, kiun oni malpli konsiderus en tia okazo. Al mi eĉ la palacoj de Palatino mem ne ŝajnus inda je ci loĝejo, do mi volus ankaŭ, ke manku al ci nenio el tiuj ornamoj kaj komfortaĵoj, al kiuj ci kutimis de la infaneco. Translokiĝu en la domon de Aŭlo, mia Ligia. Mi multe pensis ĉi tie pri tio. Se Nerono estus en Romo, la famo pri cia reveno efektive povus per sklavoj atingi ĝis Palatino, direkti al ci la atenton kaj kaŭzi persekutadon

*pro tio, ke ci kuraĝis agi kontraŭ la volo de la imperiestro. Sed li longe restos ĉi tie en Ancio, kaj antaŭ ol li revenos, la sklavoj estos delonge ĉesintaj pri tio paroli. Lino kaj Urso povos loĝi kun ci. Cetero mi vivas per la espero, ke antaŭ ol Palatino revidos la imperiestron, ci, mia dia, loĝos jam en la propra domo ĉe Karinoj. Benita estu la tago, la horo kaj la momento, en kiu ci transpaŝos mian sojlon, kaj se Kristo, kiun mi lernas konfesi, faros tion, benita estu ankaŭ lia nomo. Mi servos lin kaj fordonos por li mian vivon kaj sangon. Malĝuste mi parolas: ni ambaŭ servos lin, kiel longe sufiĉos al ni la ŝpinaĵo de la vivo. Mi amas cin kaj salutas per la tuta animo».*

## Ĉapitro 39<sup>a</sup>

Urso ĉerpis akvon el cisterno kaj, tirante per ŝnuro duoblan amforon, kantis duonvoĉe strangan ligian kanton, rigardante samtempe per ĝojegaj okuloj Ligian kaj Vinicion, kiuj meze de cipresoj en la ĝardeneto de Lino blankis, kiel du statuoj. Plej facila vento ne movis iliajn vestojn. Ora kaj violkolora krepusko kovradis iom post iom la mondon kaj ili, en la vespera trankvilo, interparolis, tenante sin reciproke je la manoj.

— Ĉu io malbona povas cin trafi, Marko, pro tio, ke ci forlasis Ancion sen la scio de la imperiestro? — demandis Ligia.

— Ne, mia kara, — respondis Vinicio. — Nerono anoncis, ke li fermos sin por du tagoj kun Terpno kaj komponados novajn kantojn. Ofte li tiel faras, kaj tiam li memoras kaj scias nenion alian. Cetere, kion signifas por mi la imperiestro, se mi estas apud ci kaj rigardas cin. Mi jam tro multe sopiris, kaj en la lastaj tagoj la dormo min forlasis. Iafoje, kiam mi ekdormetis pro laceco, mi vekigadis subite kun la sento, ke danĝero pezas super ci; kelkfoje mi songis, ke oni rabis miajn envojajn ĉevalojn, kiuj devis porti min el Ancio Romon kaj per kiuj mi trakuris tiun distancon tiel rapide, kiel neniam ĝin trakuris iu imperiestra ku-

riero. Kaj pli longe mi ne plu povis vivi sen ci. Mi amas cin tro multe, mia kara, mia plej kara!

— Mi sciis, ke ci venos. Dufoje Urso iris laŭ mia peto al Karinoj kaj demandis pri ci en cia domo. Lino priridis min, kaj ankaŭ Urso.

Efektive oni vidis, ke ŝi lin atendis, ĉar anstataŭ la ĉiutagan malhelan veston ŝi surhavis molan, blankan stolon, el kies belegaj faldoj ŝiaj ŝultroj kaj kapo elprofundiĝadis kvazaŭ florantaj primoloj el neĝo. Kelkaj rozkoloraj anemonoj ornamis ŝiajn harojn.

Vinicio alpremis la buŝon al ŝia mano, poste ili sidiĝis sur ŝtona benko meze de sovaĝa vito, kaj apoginte sin ŝultro al ŝultro, silentis, rigardante la vesperan ĉielruĝon, kies lastaj briloj spegulis sin en iliaj okuloj.

La ĉarmo de la kvieta vespero ekregadis ilin iom post iom.

— Kiel trankvile estas ĉi tie kaj kiel belega estas la mondo, — diris Vinicio per mallaŭta voĉo. — La nokto venas treege serena. Mi sentas min tiel feliĉa, kiel neniam en la vivo mi estis. Diru al mi, Ligia, kio ĝi estas? Mi neniam supozis, ke povas ekzisti tia amo. Mi pensis, ke ĝi estas nur fajro en la vejnoj kaj voluptavido, sed nur nun mi vidas, ke oni povas ami per ĉiu guto da sango, per ĉiu spiro, kaj senti kune tian trankvilon dolĉan kaj senliman,

kvazaŭ la animon jam estus kvietigintaj Dormo kaj Morto. Ĝi estas por mi io nova. Mi rigardas tiun trankvilon de la arboj kaj ŝajnas al mi, ke ĝi estas en mi. Nur nun mi komprenas, ke povas ekzisti feliĉo, pri kia la homoj ĝis nun ne sciis. Nur nun mi komprenas, kial ci kaj Pomponia Grecina estas tiel serenaj ... Jes!... Tion donas Kristo...

Kaj ŝi en la sama momento metis sian belegan vizaĝon sur lian ŝultron kaj diris:

— Mia kara Marko...

Ŝi ne povis paroli plu. Ĝojo, dankemo, sento, ke nur nun ŝi rajtas ami, sufokis ŝian voĉon, aŭflanke ili plenigis ŝiajn okulojn per larmoj de kortuŝo. Vinicio, ĉirkaŭbrakinte ŝian delikatan korpon, karespremis ŝin dum momento, poste diris:

— Ligia! Benita estu la momento, en kiu mi ekaŭdis unuafoje lian nomon.

Kaj ŝi respondis mallaŭte:

— Mi amas cin, Marko.

Poste ambaŭ denove eksilentis, ne povante eligi vortojn el la sentoplenaj brustoj. Sur la cipresoj estingiĝis la lastaj violkoloraj rebriloj kaj la ĝardeno komencis arĝenti de la kvaronluma klingo.

Post momento Vinicio komencis paroli:

— Mi scias ... Apenaŭ mi eniris ĉi tien, apenaŭ mi kisis

ciajn karajn manojn, mi legis en ciah okuloj la demandon, ĉu mi komprenas tiun Dian instruon, kiun ci konfesas, kaj ĉu mi estas baptita? Ne, mi ne estas baptita, sed ĉu ci scias, mia floro, kial? Jen Paŭlo diris al mi: «Mi cin konvinkis, ke Dio venis en la mondon kaj lasis sin krucumi por savi la mondon, sed en la fonto de difavoro lavu cin Petro, kiu unua etendis super ci la manojn kaj unua cin benis.» Kaj mi volis ankaŭ, ke ci, mia plej kara, rigardu mian bapton kaj ke mia baptopatrino estu Pomponia. Tial mi ne estas ĝis nun baptita, kvankam mi kredas je la Savinto kaj je lia dolĉa instruo. Paŭlo min konvinkis, konvertis, kaj ĉu povis okazi alie? Kiel mi povus ne kredi, ke Kristo venis en la mondon, se tion diras Petro, kiu estis lia disĉiplo, kaj Paŭlo, al kiu li sin konigis? Kiel mi povus ne kredi, ke li estis Dio, se li leviĝis el mortintoj? Oni ja vidis lin en la urbo, kaj ĉe la lago kaj sur la monto, kaj vidis lin homoj, kies buŝoj ne konas mensogon. Mi jam ekkredis tion en la tempo, kiam mi aŭdis Petron en Ostriano, ĉar jam tiam mi diris al mi: en la tuta mondo ĉiu alia homo povus mensogi, krom tiu, kiu diras: «Mi vidis!» Sed mi timis vian instruon. Ŝajnis al mi, ke ĝi cin rabas de mi. Mi opiniis ke estas en ĝi nek saĝeco, nek beleco, nek feliĉo. Hodiaŭ tamen, kiam mi ekkonis, kia homo mi estus, se mi ne volus, ke en la mondo regu vero, ne mensogo; amo, ne malamo;

bono, ne krimo; fideleco, ne malfideleco; kompatemo, ne venĝo? Ĉu estas homo, kiu tion ne volus kaj ne preferus? Kaj tion ja proklamas via instruo. Ankaŭ aliaj instruoj strebas al justeco, sed tiu ĉi sola faras la homan koron justa. Kaj krom tio ĝi faras ĝin pura, kiel cia koro kaj la koro de Pomponia, kaj ĝi faras ĝin fidela, kiel cia koro kaj la koro de Pomponia. Mi estus blinda, se mi tion ne vidus. Kaj se krom tio Kristo promesis vivon eternan kaj feliĉon tiel senmezuran, kian nur la Dia ĉiopovo kapablas doni, kion do pli oni povas deziri? Se mi demandus Senekon, pro kiuj motivoj li rekomendas virton, se malvirto alportas pli da feliĉo, li vere povus respondi al mi nenion prudentan. Sed mi nun scias, kial mi devas esti virta. Jen tial, ĉar bono kaj amo fluas de Kristo; kaj pro tio, ke kiam la morto fermos miajn okulojn, mi retrovu la vivon, retrovu la feliĉon, retrovu min mem kaj cin, mia plej kara ... Kiel mi povus ne ami kaj ne akcepti la instruon, kiu kune diras la veron kaj neniigas la morton? Kiu ne preferus bonon ol malbonon? Mi pensis, ke tiu instruo kontraŭas feliĉon, dume Paŭlo min konvinkis, ke ĝi ne nur nenion forprenas, sed eĉ donas pli multe. Ĉio tio apenaŭ povas trovi lokon en mia kapo, sed mi sentas, ke tiel estas, ĉar neniam mi estis egale feliĉa, nek mi povus esti, eĉ se mi prenus cin perforte kaj havus en mia domo. Ci diris al mi antaŭ

momento: «Mi amas cin», kaj tiujn vortojn mi ne eligus el ci per la tuta potenco de Romo. Ho Ligia! La saĝo diras, ke tiu ĉi instruo estas Dia kaj plej bona, la koro ĝin sentas, kaj al tiaj du potencoj kiu povas kontraŭstari?

Ligia aŭskultis lin, fiksinte sur li siajn bluajn okulojn, similajn en la lunbrilo al mistikaj floroj, kaj roskovritajn, kiel floroj.

— Jes, Marko! Vere! — ŝi diris, alpremante pli forte la kapon al lia ŝultro.

Kaj en tiu momento ambaŭ sentis sin treege feliĉaj, ĉar ili komprenis, ke, krom amo, ligas ilin ankoraŭ iu alia forto, kune dolĉa kaj nevenkebla, forto, per kiu la amo mem iĝas io senpasa, superstaranta ŝanĝojn, seniluziigojn, perfidon, kaj eĉ morton. Iliajn korojn plenigis komplete la certeco, ke malgraŭ ĉio ajn, kio povus okazi, ili ne ĉesos ami sin reciproke kaj aparteni unu al la alia. Kaj pro tio neesprimebla paco fluis en iliajn animojn. Vinicio sentis, krome, ke ĝi estas amo ne nur pura kaj profunda, sed tute nova, tia, kian la mondo ĝis nun ne konis kaj ne povis doni. Formis ĝin en lia koro ĉio: Ligia, kaj la instruo de Kristo, kaj la lunbrilo, trankvile dormanta sur la cipresoj, kaj la serena nokto, tiel ke la tuta universo ŝajnis al li plena je tiu sola amo.

Post momento li denove komencis paroli per voĉo



mallaŭta kaj tremanta:

— Ci estos la fiero de mia animo kaj ci estos al mi plej kara en la mondo. Samtakte batos niaj koroj, komuna estos nia preĝo kaj komuna nia dankemo al Kristo. Ho mia kara! Vivi kune, adori kune la dolĉan Dion kaj scii, ke kiam venos la morto, niaj okuloj ree malfermiĝos, kiel post trankvila dormo, al nova lumo — kion pli bonan oni povas imagi? Do mi nur miras, ke mi ĝin antaŭe ne komprenis. Kaj ĉu ci scias, kio nun ŝajnas al mi? — nome, ke al tiu instruo neniu kontraŭstaros. Post ducent aŭ tricent jaroj akceptos ĝin la tuta mondo, kaj estos neniuj dioj krom Kristo, kaj neniuj temploj krom la kristanaj. Kiu ne volus sian propran feliĉon? Ha, mi aŭdis ja interparolon de Paŭlo kun Petronio, kaj ĉu ci scias, kion Petronio diris fine? «Tio ne estas por mi», sed nenion pli li sciis respondi.

— Ripetu al mi la vortojn de Paŭlo, — diris Ligia.

— Tio estis ĉe mi, vespere. Petronio komencis paroli facilmaniere kaj ŝerci, kiel li kutime faras; tiam Paŭlo diris al li: «Kiel ci povas, saĝa Petronio, nei, ke Kristo ekzistis kaj leviĝis el mortintoj, se ci ne estis tiam en la mondo? Dume Petro kaj Johano vidis lin, kaj ankaŭ mi lin vidis envoje al Damasko. Unue do cia saĝeco pruvu, ke ni estas mensogantoj, kaj nur poste ĝi neu niajn atestojn». Sed

Petronio respondis, ke li tute ne intencas nei, ĉar li scias, ke okazas en la mondo multaj nekompreneblaj aferoj, kiujn tamen kredindaj homoj atestas. Sed, li diris, alia afero estas malkovri iun novan, alilandan Dion, kaj alia akcepti lian instruon. «Mi volas, — li diris, — scii pri nenio, kio povus fuŝi mian vivon kaj detrui ĝian belecon. Ne gravas, ĉu niaj dioj estas veraj, sed ili estas belaj, estas al ni gaje kun ili, kaj ni povas vivi senzorge.» Tiam Paŭlo respondis jene: «Ci malakceptas la instruon de amo, justeco kaj kompatemo, ĉar ci timas la zorgojn de la vivo, sed pripensu, Petronio, ĉu via vivo vere estas libera de zorgoj? Nek ci, sinjoro, nek iu el la plej riĉaj kaj plej povohavaj inter vi scias, ĉu, endormiĝinte vespere, li ne vekiĝos matene kun mortverdiko. Dume, se la imperiestro konfesus tiun instruon, kiu ordonas amon kaj justecon, ĉu cia feliĉo ne estus pli sekura? Ci timas pri ciaj ĝojoj, sed ĉu la vivo ne estus tiam pli ĝojplena? Kaj koncerne la ornamojn de la vivo kaj la belon, se vi konstruis tiom da grandiozaj temploj kaj statuoj honore al dioj malbonaj, venĝemaj, adultaj kaj falsaj, kiom pli belajn vi konstruus al unu sola Dio, amo kaj vero? Ci estas kontenta de cia sorto, ĉar ci estas riĉa kaj vivas en lukso, sed same ci povus esti malriĉa kaj forlasita, kvankam el granda gento ci devenas, kaj tiam, vere, estus al ci pli bone en la mondo, se la hom-

oj konfesus Kriston. En via urbo eĉ riĉaj gepatroj, ne volante havi zorgojn pro la edukado de la infanoj, ofte forigas ilin el la domo; tiajn infanojn oni nomas *zorgatoj*. Ankaŭ ci, sinjoro, povus esti tia *zorgato*. Sed se ciaj gepatroj vivus laŭ nia instruo, tio ne povus al ci okazi. Se ci, atinginte la viran aĝon, edziĝus al amata virino, ci preferus, ke ŝi restu al ci fidela ĝis la morto. Dume rigardu, kio ĉe vi okazas, kiom da senhonteco estas, kiom da malhonoro, kiom da malrespekto al geedza ligo! Vi ja mem jam miras, se vi trovas inter vi virinon, kiun vi nomas *univira*. Sed mi diras al ci, ke tiuj virinoj, kiuj havos Kriston en la koro, ne malfideliĝos al siaj edzoj, same kiel la kristanaj edzoj estos fidelaj al la edzinoj. Antaŭ vi tremas la tuta mondo, sed vi tremas antaŭ la propraj sklavoj, ĉar vi scias, ke ĉiuhore ili povas ekribeli terure kontraŭ via tiraneco, kiel ili jam plurfoje ribelis. Ci estas riĉa, sed ci ne scias, ĉu morgaŭ oni ne igos cin forlasi la riĉaĵojn; ci estas juna, sed morgaŭ eble ci devos morti. Ci amas, sed perfido embuskas kontraŭ ci; ci ŝatas vilaojn kaj ĝardenojn, sed morgaŭ ci povos esti ekzilita en la solejojn de Pandatario; ci havas milojn da servistoj, sed morgaŭ tiuj servistoj povos elverŝi cian sangon. Kaj se tiel estas, kiel vi povas esti trankvilaj, feliĉaj kaj vivi en ĝojo? Sed mi proklamas amon kaj mi proklamas instruon, kiu ordonas al regantoj

ami siajn regatojn, al sinjoroj — ami siajn sklavojn, al sklavoj — servi pro amo, agi kun justeco kaj kompatemo, fine ĝi promesas feliĉon, kiel maro senliman, senfinan. Kiel do ci povas, Petronio, diri, ke tiu instruo fuŝas la vivon, se ĝi riparas la vivon kaj se ci mem estus centoble pli feliĉa kaj pli sekura, se ĝi ekposedus la mondon, kiel ĝin ekposedis via roma regado.»

Tiel parolis Paŭlo, ho Ligia, kaj tiam Petronio diris: «Tio ne estas por mi», kaj, ŝajnigante sin dormema, li eliris, dirante ankoraŭ ĉe la eliro: «Mi preferas, hebreo, mian Eŭnikon ol cian instruon, sed mi ne volus batali kontraŭ ci de sur tribunuo.» Mi tamen aŭskultis liajn vortojn per la tuta animo, kaj kiam li parolis pri niaj virinoj, mi gloris tutkore tiun instruon, el kiu ci elkreskis, kiel printempe elkreskas lilioj el fruktodona tero. Kaj mi pensis tiam: jen Popea forlasis du edzojn por Nerono, jen Kalvia Krispinilla, jen Nigidia, jen preskaŭ ĉiuj, kiujn mi konas, krom la sola Pomponia, malfideliĝas al la geedza ligo kaj al siaj ĵuroj, nur ŝi sola, nur ŝi, mia elektita, ne forlasos min, ne trompos, ne surŝutos per cindro la hejman fajron, eĉ se forlasus kaj trompus min ĉio, al kio mi konfidis. Do mi parolis al ci en la animo: per kio mi repagos al ci, se ne per amo kaj adoro? Ĉu ci sentis, ke mi tie, en Ancio, turnadis min al ci kaj interparolis kun ci senĉese, senrom-

pe, kvazaŭ ci estus apude? Centoble pli mi cin amas pro tio, ke ci forkuris de mi el la imperiestra palaco. Ankaŭ mi ne volas ĝin plu. Mi ne volas ĝiajn voluptojn kaj muzikon, nur cin solan. Diru unu vorton, kaj ni forlasos Romon por ekloĝi for, malproksime.

Ligia, ne deturnante la kapon de lia ŝultro, levis la okulojn, kvazaŭ penseme, al la arĝente brilantaj pintoj de la cipresoj kaj respondis:

— Bone, Marko. Ci skribis al mi pri Sicilio, kie ankaŭ la Plaŭcioj volas pasigi la jarojn de sia maljuneco...

Kaj Vinicio interrompis kun ĝojo:

— Jes, mia kara! Mia posedaĵo najbaras kun ilia. Mirinda estas tiu bordlando, kie la klimato estas ankoraŭ pli dolĉa, la noktoj ankoraŭ pli serenaj ol la romaj, aromaj kaj lumaj ... Tie vivo kaj feliĉo estas preskaŭ la samo.

Poste li komencis revii pri la estonteco.

— Tie oni povas forgesi ĉiajn zorgojn. En boskoj, en olivarbaroj ni promenados kaj ripozados en la ombro. Ho Ligia! kia mirinda vivo — ami, ĝui trankvilon, kune rigardi la maron, kune rigardi la ĉielon, kune glori la dolĉan Dion, fari ĉirkaŭe bonon kaj justecon en paco.

Ambaŭ eksilentis, rigardante la estontecon; li nur karespremis ŝin al si ĉiam pli forte, ĉe kio en la lunbrilo flagris sur lia mano la kavalira ringo. En la kvartalo, oku-

pata de malriĉa, laborista loĝantaro, ĉiuj jam dormis kaj nenia brueto konfuzis la silenton.

— Ĉu ci permesos al mi vidi Pomponian? — demandis Ligia.

— Jes, mia kara. Ni invitados ilin en nian domon aŭ mem irados al ili. Ĉu ci volas, ke ni kunprenu Petron la apostolon? Li estas laca de la aĝo kaj laboro. Ankaŭ Paŭlo nin vizitados, li konvertos Aŭlon Plaŭcion, kaj kiel soldatoj fondas koloniojn en malproksimaj landoj, tiel ni fondos kristanan kolonion.

Ligia levis la manon kaj, preninte la manon de Vinicio, volis alpremi al ĝi la buŝon, sed li parolis flustre, kvazaŭ li timus alarmi la feliĉon:

— Ne, Ligia! Ne! Mi cin amegas kaj adoras, ci donu al mi la manojn.

— Mi amas cin.

Sed li alpremis jam la buŝon al ŝiaj manoj, blankaj, kiel jasmeno, kaj dum momento ili aŭdis nur la batadon de siaj koroj. En la aero ne estis eĉ plej eta blovo kaj la cipresoj staris tiel senmove, kvazaŭ ankaŭ ili retenus la spiron en la brustoj...

Subite la silenton interrompis tondro neatendita, profunda kaj kvazaŭ venanta el sub la tero. Tremo trakuris la korpon de Ligia, kaj Vinicio, leviĝinte, diris:

— Leonoj muĝas en la bestejoj...

Kaj ambaŭ komencis aŭskulti. Dume al la unua muĝo respondis dua, tria, deka, el ĉiuj flankoj kaj kvartaloj. En la urbo estis iafoje kelkaj miloj da leonoj, lokitaj ĉe diversaj arenoj, kaj fojfoje nokte, proksimiĝante al la kradegoj kaj apogante sur ili siajn grandegajn kapojn, ili voĉis tiamaniere sian sopiron al libereco kaj dezerto. Tiel ili komencis sopiri ankaŭ ĉi-foje, kaj transdonante la tonon unu al alia en la nokta silento, plenigis la urbon per muĝado. Estis en tio io neesprimeble minaca kaj malserena, tial Ligia, al kiu tiuj voĉoj konfuzis la lumajn viziojn de la estonteco, aŭskultis ilin kun koro premita de ia stranga teruro kaj malĝojo.

Sed Vinicio ĉirkaŭbrakis ŝin kaj diris:

— Ne timu, mia kara. La cirkoludoj proksimiĝas, do ĉiuj bestejoj estas plenegaj.

Poste ili ambaŭ eniris la domon de Lino, akompanate de ĉiam pli potenca tondro de la leonaj muĝoj.

## Ĉapitro 40<sup>a</sup>

Dume Petronio preskaŭ ĉiutage atingadis en Ancio novajn venkojn kontraŭ la aŭgustanoj, rivalantaj kun li pri favoro de la imperiestro. La influo de Tigeleno tute nuliĝis. En Romo, kie oni devis neniigadi homojn, kiuj ŝajnis danĝeraj, rabadi iliajn havaĵojn, prizorgadi politikajn aferojn, aranĝadi cirkludojn, elvokantajn miron pro sia lukso kaj malbona gusto, kaj fine, kontentigadi monstrajn ekplaĉojn de Nerono, Tigeleno, same ruza, kiel preta al ĉio, montriĝadis nepra. Sed en Ancio, meze de la palacoj, spegulantaj sin en la mara lazuro, Nerono vivis la grekan vivon. De mateno ĝis vespero oni legadis versaĵojn, paroladis pri ilia konstruo kaj perfekteco admiradis sukcesajn parolturnojn, okupadis sin pri muziko, teatro, unuvorte ekskluzive pri tio, kion eltrovis kaj per kio ornamis la vivon la greka genio. Sed en tiaj kondiĉoj Petronio, senkompare pli klera ol Tigeleno kaj aliaj aŭgustanoj, sprita, elokventa, plena je subtilaj sentoj kaj gusto, devis akiri superecon. Nerono serĉis lian societon, demandadis lian opinion, petadis konsilon, kiam li mem verkis, kaj elmontradis al li amikecon pli vivan ol iam antaŭe. Al la ĉirkaŭantoj ŝajnis, ke lia influo atingis jam finan venkon, ke la amikeco inter li kaj Nerono iĝis jam konstanta kaj



daŭros dum jaroj. Eĉ tiuj, kiuj antaŭe elmontradis mal-simpation al la eleganta epikurano, nun komencis lin ĉirkaŭi kaj klopodi pri lia favoro. Pluraj eĉ estis sincere kontentaj en la animo, ke la superecon gajnis homo, kiu sciis, vere, kion pensi pri ĉiu kaj akceptadis kun skeptika rideto flatojn de siaj hieraŭaj malamikoj, sed ĉu pro eleganteco, aŭ pro bonmanieroj, ne estis venĝema kaj ne uzis sian potencon je malbono de aliaj. Estis momentoj, kiam li povis pereigi eĉ Tigelenon, sed li preferis moki la lastan kaj evidentigadi lian senedukitecon kaj vulgarecon. La senato en Romo ekspiris, ĉar de unu kaj duono da monatoj neniu mortkondamno estis verdiktita. Tiel en Ancio, kiel en la Urbo oni rakontadis, vere, mirindaĵojn pri la rafiniteco, kiun atingis la diboĉoj de Nerono kaj de lia favorato, ĉu preferis tamen senti super si la imperiestron rafinitan ol krueliĝintan, kiel sovaĝa besto, en la manoj de Tigeleno.

Tigeleno mem sin sentis senhelpa kaj hezitis, ĉu li rezignu la batalon, ĉar Nerono multfoje diradis, ke en la tuta Romo kaj en tuta kortego estas nur du animoj kapablaj kompreni sin reciproke, kaj du veraj grekoj: li kaj Petronio.

La mirindega lerteco de tiu ĉi lasta konfirmis la homojn en la konvinko, ke lia influo daŭros pli ol ĉiuj aliaj. Oni ne plu imagis, kiel Nerono povus sin senigi je Petro-

nio — kun kiu li povus paroli pri poezio, muziko, vetkur-oj, kaj en kies okulojn li rigardus, volante certiĝi, ĉu tio, kion li verkis, estas efektive perfekta? Petronio siaflanke, kun la kutima senzorgo, ŝajnis atribui nenian signifon al sia pozicio. Li estis, kiel ordinare, malrapidema, maldiligenta, sprita kaj skeptika. Multfoje li impresis la homojn, kvazaŭ li mokus ilin, sin mem, la imperiestron kaj la tut-an mondon. Iamomente li kuraĝis eĉ riproĉi Neronon okuloj kontraŭ okuloj, kaj kiam la aliaj kredis, ke li riskas tro multe aŭ simple preparas al si pereon, li sciis subite spici la riproĉon tiel, ke ĝi rezultis je lia profito, kaj en la ĉeestantoj vekadis admiron kaj la konvinkon, ke ne ekzistas situacio, el kiu li ne eliĝus triumfe. Foje, pli malpli semajnon post la reveno de Vinicio el Romo, Nerono legis en malgranda rondo fragmentojn el sia *Troica*; kiam li finis kaj kiam trasonis la ravekkrioj, Petronio, demandite de la imperiestro per rigardo, diris:

— Mizeraj versoj, indaj esti ĵetitaj en fajron.

La koroj de la ĉeestantoj ĉesis bati pro teruro, ĉar Nerono de sia infaneco neniam aŭdis el ies buŝo similan juĝon; nur la vizaĝo de Tigeleno ekradiis de ĝojo. Vinicio, aliflanke, paliĝis ĉe la penso ke Petronio, kiu neniam ebriis, ĉi-foje ebriiĝis.

Kaj Nerono komencis demandi per miela voĉo, en kiu

tamen vibris profunde vundita memamo:

— Kion malbonan ci trovas en ili?

Tiam Petronio ekatakis lin.

— Ne kredu al ili, — li diris, montrante per la mano la ĉeestantojn, — ili nenion komprenas pri poezio. Ci demandas, kio estas malbona en tiuj versoj? Se ci volas la veron, mi diros al ci: ili estas bonaj por Virgilio, bonaj por Ovidio, bonaj eĉ por Homero, sed ne por ci. Ci ne rajtas verki tiajn. Tiu brulo, kiun ci priskribas, nesufiĉe flamas, cia fajro nesufiĉe brulvundas. Ne aŭskultu la flatojn de Lukano. Lin por tiaj samaj versoj mi konfesus geniulo, sed ne cin. Ĉu ci scias, kial? Ĉar ci estas pli granda ol ili. Al kiu la dioj donis tiom, kiom al ci, de tiu oni povas pli multe postuli. Sed ci estas maldiligenta. Ci preferas siesti post la tagmanĝo ol ĉifi la veston, sidante ĉe la laboro. Ci povas krei poemon, al kiu similan la mondo ĝis nun ne konis, kaj tial mi diras al ci en la okulojn: verku pli bonan!

Li diris tion senzorge, kvazaŭ mokante kaj kune grumblante, sed la okuloj de Nerono kovriĝis per nebulo de volupto kaj li diris:

— La dioj donis al mi ioman talenton, sed ili donis al mi ankaŭ pli multe, nome kompetentan kaj veran amikon, kiu sola scias paroli veron en la okulojn.

Dirinte tion, li etendis sian dikan manon, surkreskitan de rustkoloraj haroj, al ora kandelabro, rabita en Delfo por bruligi la versaĵon.

Sed Petronio forprenis ĝin de li, antaŭ ol la flamo tuŝis la papiruson.

— Ne, ne! — li diris, — eĉ tiel mizera versaĵo apartenas al la homaro. Lasu ĝin al mi.

— Permesu tiuokaze, ke mi sendu ĝin al ci en skatolo de mi mem projektita, — respondis Nerono, premante liajn manojn.

Kaj post momento li komencis paroli:

— Jes, ci pravas. Mia brulego de Trojo nesufiĉe brulas, mia fajro nesufiĉe brulvundas. Mi pensis tamen, ke se mi egalos al Homero, mi jam povos esti kontenta. Certa manko de kuraĝo kaj tro modesta sintaksado ĉiam malhelpis min. Ci malfermis al mi la okulojn. Sed ĉu ci scias, kial estas tiel, kiel ci diras? Jen, kiam skulptisto volas krei figuron de dio, li serĉas modelon, mi dume havis nenian modelon. Mi neniam vidis brulantan urbon kaj tial en mia priskribo mankas vereco.

— Do mi diros al ci, ke oni devas esti tamen granda artisto por tion kompreni.

Nerono enpensiĝis, kaj post momento li diris:

— Respondu, Petronio, al unu mia demando: ĉu ci be-

daŭras, ke Trojo forbrulis?

— Ĉu mi bedaŭras?... Je la lama edzo de Venero, tute ne! Kaj mi diros al ci, kial! Jen Trojo ne forbrulus, se Prometeo ne estus donacinta fajron al la homoj kaj se la grekoj ne estus vokintaj Priamon al milito; kaj se ne estus fajro, Eŝhilo ne verkus sian «Prometeo»n, same kiel, sen la milito, Homero ne verkus «Iliado»n. Mi preferas, ke ekzistu «Prometeo» kaj «Iliado», ol ke konserviĝus urb-aĉo, verŝajne mizera kaj malpura, en kiu nun sendube sidus iu aĉa provincestro kaj tedadus cin per konfliktoj kun la loka areopago.

— Jen, kion signifas paroli prudente, — respondis Nerono. — Por poezio kaj arto oni rajtas kaj devas oferi ĉion. Feliĉaj la aĥajanoj, kiuj havigis al Homero la temon por «Iliado», kaj feliĉa Priamo, kiu rigardis la pereon de la patrujo! Kaj mi? Mi neniam vidis brulantan urbon.

Sekvis momento da silento, kiun interrompis Tigeleno.

— Mi ja diris jam al ci, Cezaro, — li ekparolis, — ordonu, kaj mi bruligos Ancion. Aŭ, prefere, se ci domaĝas ĉi tiujn vilaojn kaj palacojn, mi ordonos bruligi la ŝipojn en Ostio aŭ konstruigos sur la albana ĉemontaĵo lignan urbon, en kiun ci mem ĵetos flamon. Ĉu ci volas?

Sed Nerono ĵetis al li rigardon plenan je malestimo.

— Ĉu mi ĝuu la vidon de brulantaj lignaj budoj? Cia intelekto tute malriĉiĝis, Tigeleno! Kaj mi vidas, krome, ke ci ne tre alte taksas mian talenton kaj mian *Troica*, se ci opinias, ke iu alia ofero estus por ĝi tro granda.

Tigeleno konfuziĝis, kaj Nerono aldonis post momento, kvazaŭ volante ŝanĝi la temon:

— La somero venas ... Ho, kiel malbonodoras nun certe tiu Romo!... Tamen por la someraj cirkoludoj oni devos tien reveni.

Subite Tigeleno diris:

— Kiam ci forigos la aŭgustanojn, Cezaro, permesu al mi resti momente kun ci...

Horon poste Vinicio, revenante kun Petronio el la imperiestra vilao, diris:

— Mi havis kaŭze de ci momenton da teruro. Mi kredis, ke ci, ebrie, pereigis cin nerevokeble. Memoru, ke ci ludas per morto.

— Ĝi estas mia areno, — respondis senzorge Petronio, — kaj amuzas min, ke mi estas sur ĝi la plej bona el la gladiatoroj. Vidu, kiel finiĝis la afero. Mia influo kreskis ankoraŭ de tiu ĉi vespero. Li sendos al mi sian versaĵon en skatolo, kiu — ĉu ci volas veti? — estos treege riĉa kaj en treege malbona gusto. Mi ordonos al mia kuracisto teni en ĝi laksigilojn. Mi tion faris ankaŭ tial, ke Tigeleno,

vidante, kiel sukcesas tiaj aferoj, volos min sendube imiti, kaj mi imagas, kio okazos, se li ĝuigos al la imperiestro spritaĵon. Ĝi estos, kvazaŭ pirenea urso volus danci sur ŝnuro. Mi ridos, kiel Demokrito. Se mi nepre volus, mi povus eble pereigi Tigelenon kaj iĝi lialoke prefekto de la pretorianoj. Tiam mi havus en la manoj Ahenobarbon mem. Sed mi estas tro maldiligenta. Mi jam preferas tian ielan vivon, kian mi vivas, kaj eĉ la versaĵojn de Nerono.

— Kia lerteco, kiu eĉ el mallaŭdo scias fari flaton! Sed ĉu efektive la versaĵo estis tiel malbona? Mi tiujn aferojn ne komprenas.

— Ĝi ne estas malpli bona ol aliaj. Lukano havas en unu fingro pli da talento, sed ankaŭ la Kuprobarba havas ion. Li havas antaŭ ĉio senliman plaĉon je poezio kaj muziko. Post du tagoj ni devas esti ĉe li kaj aŭskulti muzikon por la himno al Afrodito, kiun li hodiaŭ aŭ morgaŭ finos. Ni estos en malgranda rondo. Nur mi, ci, Tulio Seneciono kaj la juna Nervo. Kaj koncerne la versaĵojn, kion mi diris al ci, ke mi ilin uzas post festeno, kiel Vitelio fenikopteran plumon, ĝi estas malvero!... Iafoje ili eĉ estas elokventaj. La vortoj de Hekubo estas kortuŝaj ... Ŝi plendas la dolorojn de akuŝo, kaj Nerono sciis trovi taŭgajn esprimojn eble tial, ke li mem en doloro akuŝas ĉiun verson ... Iafoje mi lin kompatas. Je Polukso! Kia stranga miksaĵo de la ec-

oj! Ankaŭ Kaligulo havis mankon en la kapo, sed tia strangulaĉo li ne estis.

— Kiu scias antaŭvidi, kion povas atingi la frenezo de Ahenobarbo? — diris Vinicio.

— Neniu, absolute. Povas ankoraŭ okazi tiaj aferoj, ke dum jarcentoj ĉe la nura penso pri ili la haroj hirtigados sur la homaj kapoj. Sed tio ĝuste estas interesa, malordinara, kaj kvankam ofte mi enuas, kiel Amona Jovo en la dezerto, mi pensas, ke kun alia imperiestro mi enuus ankoraŭ pli. Cia Paŭlo la hebreo estas elokventa, tion mi pri li konfesas; kaj se homoj similaj al li proklamados tiun instruon, niaj dioj gardu sin serioze, ke ili iam ne iru en malnovaĵejon. Vere, ke se, ekzemple, la imperiestro estus kristano, ni ĉiuj sentus nin pli sekuraj. Sed — vidu — cia profeto el Tarso, koncernigante siajn argumentojn al mi, ne pensis, ke tiu ĉi necerteco prezentas por mi la ĉarmon de la vivo. Kiu ne ludas kubojn, ne malgajnas sian havaĵon, tamen homoj ludas kubojn. Estas en tio ia plezurego kaj ia forgeso. Mi konas filojn de kavaliroj kaj senatanoj, kiuj propravole iĝis gladiatoroj. Ci diras, ke mi ludas per la vivo, kaj tiel estas, sed mi faras tion, ĉar ĝi min amuzas, kaj viaj kristanaj virtoj enuigus min, same kiel la traktaĵoj de Seneko, en unu tago. Tial la elokventeco de Paŭlo restis senefika. Li devus kompreni, ke tiaj homoj, kiel mi,



neniam akceptos tiun instruon. Ci — estas io alia! Kun cia naturo ci povis aŭ ekmalami la nomon de kristano, kiel peston, aŭ iĝi kristano. Mi konfesas ilin pravaj, oscedante. Ni frenezas, kuras al abismo, io nekonata venas al ni el la estonteco, io krakas sub ni, io mortas apude — mi konsentas! Sed ni scios morti, kaj dume ni ne deziras ŝargi la vivon kaj servi al la morto, antaŭ ol ĝi nin prenos. Vivo ekzistas por si mem, ne por morto.

— Mi tamen cin bedaŭras, Petronio.

— Ne bedaŭru min pli ol mi min mem bedaŭras. Antaŭe ci ne sentis cin inter ni malbone, kaj, militante en Armenujo, ci sopiris Romon.

— Ankaŭ nun mi sopiras Romon.

— Jes! Ĉar ci ekamis kristanan vestalon, kiu loĝas en Transtibero. Tion mi nek primiras, nek riproĉas al ci. Mi miras pli multe, ke malgraŭ tiu instruo, pri kiu ci diras, ke ĝi estas maro da feliĉo, kaj malgraŭ tiu amo, kiu estas baldaŭ kronota, malĝojo ne malaperas de cia vizaĝo. Pomponia Grecina estas ĉiam malgaja, kaj ci, de la tempo, kiam ci iĝis kristano, ĉesis rideti. Ne penu min konvinki, ke ĝi estas gaja instruo. El Romo ci revenis eĉ pli malgaja ol antaŭe. Se tia estas via kristana amo, je la helaj bukloj de Bakĥo! Mi ne sekvos vian ekzemplon.

— Tio estas alia afero, — respondis Vinicio, — mi ĵuras

al ci ne je la bukloj de Bakĥo, sed je la animo de mia patro, ke neniam en la antaŭa tempo mi eĉ antaŭgustumis tian feliĉon, kian mi spiras hodiaŭ. Sed mi sopiras senlime kaj — pli strange — kiam mi estas for de Ligia, ŝajnas al mi, ke super ŝi pezas ia danĝero. Mi ne scias, kia ĝi estas, nek de kie ĝi povus veni, sed mi ĝin antaŭsentas, kiel oni antaŭsentas fulmotondron.

— Mi promesas dum du tagoj havigi por ci permeson forlasi Ancion por tiel longe, kiel ci volos. Popea estas iel pli trankvila kaj, kiom mi scias, nenio minacas de ŝi al ci, nek al Ligia.

— Eĉ hodiaŭ ŝi min demandis, kion mi faris en Romo, kvankam mia forveturo estis sekreto.

— Povas esti, ke ŝi ordonis cin spioni. Tamen nun ankaŭ ŝi devas konsideri mian influon.

Vinicio haltis kaj diris:

— Paŭlo diras, ke Dio iafoje avertas, sed ne permesas kredi aŭgurojn, do mi kontraŭstaras al tiu kredo, sed mi ne povas ĝin venki. Mi rakontos al ci, kio okazis por deĵeti la ŝarĝon de la koro. Mi sidis kun Ligia, unu apud la alia, en nokto tiel serena, kiel la hodiaŭa, kaj ni planis nian estontan vivon. Mi ne scias diri al ci, kiel feliĉaj kaj trankvilaj ni estis. Subite leonoj komencis muĝi. Tio estas en Romo ordinara afero, tamen de tiu momento mi ne ha-

vas trankvilon. Ŝajnas al mi, ke estis en tio ia minaco, kvazaŭ aŭguro de malfeliĉo ... Ci scias, ke teruro ne kaptas min facile, sed tiam okazis io, ke teruro plenigis la tutan mallumon de la nokto. Tio venis tiel strange kaj tie neatendite, ke nun mi havas senĉese en la oreloj tiujn sonojn kaj senĉesan maltrankvilon en la koro, kvazaŭ Ligia bezonus mian defendon de io terura ... eble ĝuste de tiuj leonoj. Kaj mi vivas en turmento. Havigu por mi permeson forveturi, ĉar alie mi forveturos senpermeso. Mi ne povas sidi ĉi tie, mi ripetas, ke mi ne povas!

Petronio ekridis.

— Tion ni ankoraŭ ne atingis, — li diris, — ke filoj de konsuloj aŭ iliaj edzinoj estu transdonataj al leonoj sur arenoj. Povas vin renkonti ĉia alia morto, sed ne tia. Kiu scias cetere, ĉu tio estis leonoj, ĉar la ĝermanaj uroj muĝas tute ne malpli forte ol ili. Koncerne min, mi mokas aŭgurojn kaj la sorton. Hieraŭ la nokto estis varma kaj mi vidis stelojn, falantajn, kiel pluvo. Al tiu kaj iu malagrabl-an senton kaŭzus tia vidaĵo, sed mi ekpensis: se estas inter ili ankaŭ mia stelo, ne mankos al mi almenaŭ societo!...

Poste li eksilentis por momento, kaj iom pensinte, diris:

— Cetere, vidu, se via Kristo leviĝis el mortintoj, li po-

vas ankaŭ vin ambaŭ gardi de la morto.

— Li povas, — respondis Vinicio, rigardante la stelplenan ĉielon.

## Ĉapitro 41<sup>a</sup>

Nerono ludis kaj kantis himnon honore al la «Kipra diino» al kiu li mem komponis versaĵojn kaj muzikon. Li estis tiutage voĉriĉa kaj sentis, ke lia muziko vere ravas la ĉeestantojn; tiu sento donis tiom da forto al la tonoj, kiujn li eligadis el la brusto, kaj tiel ekzaltis lian propran animon, ke li ŝajnis esti inspirita. Fine li paliĝis pro sincera emocio, kaj probable la unuan fojon en la vivo li ne volis aŭskulti laŭdojn de la ĉeestantoj. Dum momento li sidis kun manoj apogitaj sur la citro kaj kun klinita kapo, poste li leviĝis subite.

— Mi estas laca kaj bezonas aeron. Agordu dume la citrojn.

Dirinte tion, li volvis silkan tukon ĉirkaŭ la gorgo.

— Ci venu kun mi, — li diris, — turnante sin al Petro-  
nio kaj Vinicio, sidantaj en angulo de la ĉambro. — Ci, Vi-  
nicio, donu al mi la brakon, ĉar mankas al mi fortoj, kaj  
Petronio parolos al mi pri muziko.

Ili iris kune sur terason, pavimitan per alabastro kaj surŝutitan per safranoj.

— Ĉi tie oni spiras pli libere, — diris Nerono. — Mia animo estas tuŝita kaj malgaja, kvankam mi vidas, ke kun tio, kion mi prove kantis, mi povas prezentiĝi publike, kaj ke ĝi estos triumfo, kian neniu romano iam ĝis nun atingis.

— Ci povas prezentiĝi ĉi tie, en Romo kaj en Aĥajo. Mi cin admiris per la tuta koro kaj menso, dia! — respondis Petronio.

— Mi scias. Ci estas tro maldiligenta por lacigi cin per laŭdoj. Kaj ci estas sincera, kiel Tulio Seneciono, sed pli kompetenta ol li. Diru al mi, kion ci opinias pri muziko?

— Kiam mi aŭskultas poezion, kiam mi rigardas kvadrigon, kondukatan de ci en cirko, belan statuon, belan templon aŭ bildon, mi sentas, ke tion, kion mi vidas, mi plene posedoprenas kaj ke en mia ravo estas ĉio, kion tiu arto povas doni. Sed kiam mi aŭskultas muzikon, precipe cian, prezentiĝas al mi ĉiam novaj beloj kaj voluptoj. Mi postkuras ilin, kaptas, sed antaŭ ol mi ilin ensorbas, alfluas jam novaj kaj novaj, tute kiel maraj ondoj, kiuj venas el senfineco. Do mi diros al ci, ke muziko estas kiel maro. Ni staras sur unu bordo kaj vidas la malproksiman ondaron, sed la alian bordon vidi ni ne povas.

— Ha, kiel profunda konanto ci estas! — diris Nerono. Kaj dum momento ili paŝis silente, nur la safranoj kra-

ketis mallaŭte sub iliaj piedoj.

— Ci esprimis mian penson, — diris fine Nerono, — kaj tial mi ĉiam diras, ke en la tuta Romo ci sola scias min kompreni. Jes. La samon ankaŭ mi opinias pri muziko. Kiam mi ludas kaj kantas, mi vidas tiajn aferojn, pri kiuj mi ne sciis, ke ili ekzistas en mia regno aŭ en la mondo. Jen mi estas imperiestro kaj la mondo apartenas al mi, mi havas ĉian povon. Tamen muziko malkovras antaŭ mi novajn landojn, novajn montojn kaj marojn kaj novajn voluptojn, kiujn mi ĝis nun ne konis. Plej ofte mi ne scias ilin nomi, nek kompreni per la intelekto — mi nur sentas ilin. Mi sentas la diojn, mi vidas Olimpon. Ia transmonda vento blovas al mi; mi rimarkas, kvazaŭ en nebulo, iajn grandajn aferojn, senlimajn kaj trankvilajn, tiel helajn, kiel sunleviĝo ... La tuta Sferoso ludas ĉirkaŭe, kaj mi konfesas al ci ... (ĉe tio ĉi la voĉo de Nerono ektremis de efektiva miro), ke mi, imperiestro kaj dio, sentas min tiam malgranda, kiel polvo. Ĉu ci kredas ĝin?

— Jes. Nur grandaj artistoj povas senti sin malgrandaj antaŭ arto...

— Hodiaŭ estas nokto de sincereco, do mi malfermas antaŭ ci la animon kiel antaŭ amiko, kaj mi diros al ci ion pli ... Ĉu ci kredas, ke mi estas blinda aŭ senigita je saĝo? Ĉu ci kredas, ke mi ne scias, ke en Romo oni skribas sur

la muregoj insultojn kontraŭ mi, ke oni min nomas patrinmortiginto kaj edzinmortiginto ... ke oni min konsideras monstro kaj kruelulo, tial, ĉar Tigeleno havigis de mi kelkajn mortverdiktojn kontraŭ miaj malamikoj? Jes, mia kara, oni min konsideras monstro, kaj mi scias pri tio. Ili kredigis al mi kruelecon tiagrade, ke mi mem min demandas iafoje, ĉu mi estas kruela. Sed ili ne komprenas tion, ke agoj de homo povas esti iafoje kruelaj, kaj la homo povas ne esti kruela. Ha, neniuj kredus, kaj eble ankaŭ ci, mia kara, ne kredos, ke en kelkaj momentoj, kiam muziko balancas mian animon, mi sentas min tiel bona, kiel infano en lulilo. Mi ĵuras al ci je tiuj steloj, kiuj brilas super ni, ke mi diras al ci la puran veron: homoj ne scias, kiom da bono kuŝas en tiu ĉi koro kaj kiajn trezorojn mi mem en ĝi ekvidas, kiam la pordon al ili malfermas muziko.

Petronio, kiu havis nenian dubon, ke Nerono parolas ĉi-momente sincere kaj ke muziko efektive povas elprofundi diversajn pli noblajn emojn de lia naturo, surprimitajn de montoj da egoismo, diboĉemo kaj krimoj, diris:

— Oni devas koni cin tiel intime, kiel mi; Romo neniame sciis cin taksi.

Kaj Nerono apogis sin pli forte sur la brako de Viniĉio, kvazaŭ li fleksiĝus sub la ŝarĝo de maljusteco, kaj respondis:

— Tigeleno diris al mi, ke en la senato oni flustras unu al alia en la orelojn, ke Diodoro kaj Terpno pli bone ludas citrojn ol mi. Eĉ tion oni al mi rifuzas! Sed ci, kiu ĉiam parolas veron, diru al mi sincere: ĉu ili ludas pli bone, aŭ egale bone kiel mi?

— Tute ne. Ci havas pli dolĉan tuŝon, kaj kune pli da forto. En ci oni ekkonas artiston, en ili — lertajn metiistojn. Kontraŭe! Aŭdinte antaŭe ilian muzikon, oni komprenas pli bone, kio ci estas.

— Se tiel estas, mi lasos ilin vivi. Neniam ili divenos, kian servon ci faris al ili en tiu ĉi momento. Cetere, se mi ilin kondamnas, mi devus akcepti aliajn muzikistojn anstataŭe.

— Kaj krome oni parolus, ke pro amo al muziko ci ekstermas muzikon en cia regno. Neniam mortigu arton pro arto, dia!

— Kiel alia ci estas ol Tigeleno, — respondis Nerono, — sed vidu, mi estas ĝuste en ĉio artisto, kaj ĉar muziko malfermas antaŭ mi spacojn, kies ekziston mi eĉ ne supozis, landojn, kiujn mi ne regas, volupton kaj feliĉon, kiujn mi neniam spertis, tial mi ne povas vivi la ordinaran vivon. Ĝi, la muziko, diras al mi, ke eksterordinareco ekzistas, do mi serĉas tiun eksterordinarecon per la tuta potenco de la povo, kiun la dioj metis en miajn manojn. Ia-



foje ŝajnas al mi, ke por atingi tiujn olimpajn mondojn oni devas fari ion tian, kion neniu homo faris ĝis nun, ke oni devas superi la homan idaron en bono aŭ malbono. Mi scias ankaŭ, ke homoj suspektas min pri frenezo. Sed mi ne frenezas, mi nur serĉas! Kaj se mi frenezas, ĝi estas pro enuo kaj malpacienco, ke mi ne povas trovi. Mi serĉas! Ci komprenas min, kaj tial mi volas esti pli granda ol homo, ĉar nur ĉi-maniere mi povas esti plej granda kiel artisto.

Ĉe tio li mallaŭtigis la voĉon, tiel ke Vinicio ne povu lin aŭdi, kaj almetinte la buŝon al la orelo de Petronio, komencis flustri:

— Ĉu ci scias, ke mi ĉefe tial kondamnis je morto la patrinon kaj la edzinon? Ĉe la sojlo de la nekonata mondo mi volis fari plej grandan oferon, kian homo povas fari. Mi pensis, ke poste io okazos kaj ke malfermiĝos ia pordo, post kiu mi ekvidos ion nekonatan. Estu ĝi mirinda aŭ terura, super la homa kompreno, ĝi estu nur eksterordinara kaj granda ... Sed ankaŭ tiu ofero ne sufiĉis. Por malfermi la transteran pordon ofero pli granda estas videble bezonata — kaj fariĝu tiel, kiel volas la orakolo.

— Kion ci intencas fari?

— Ci vidos ĝin, ci vidos pli baldaŭ ol ci supozas. Dume sciu, ke ekzistas du Neronoj: unu tia, kian la homoj konas

en mi, la alia – artisto, kiun konas nur ci sola kaj kiu, se li detruas, kiel morto, aŭ diboĉas, kiel Bakĥo, faras ĝin tial, ke li volas sufoki la vulgarecon kaj mizerecon de la ordinara vivo kaj ke li volas ĝin elsarki, se li eĉ devus uzi fajron aŭ feron ... Ho, kiel vulgara estos ĉi tiu mondo, kiam en ĝi ne plu estos mi!... Ankoraŭ neniu divenas, nek eĉ ci, mia kara, kia artisto mi estas. Sed ĝuste tial mi suferas kaj sincere al ci diras, ke la animo estas en mi iafaje tiel malgaja, kiel tiuj cipresoj, kiuj nigras tie antaŭ mi. Malfacile estas al homo porti la ŝarĝon de la plej granda povo kaj de la plej granda talento...

– Mi kompatas cin, Cezaro, per la tuta koro, kaj kun mi kompatas cin la tero kaj la maro, ne kalkulante Vinicion, kiu cin adoras en la animo.

– Li ĉiam estis al mi simpatia, – diris Nerono, – kvankam li servas al Marso, ne al la muzoj.

– Li servas antaŭ ĉio al Afrodito, – respondis Petroanio.

Kaj subite li decidis per unu ekludo solvi la aferon de la nevo kaj kune forigi ĉiajn danĝerojn, kiuj povus lin minaci.

– Li estas enamiĝinta, kiel Troilo je Ĥrizidino<sup>270</sup>, – li

<sup>270</sup> **Troilo** [PIV] — Troja reĝido, filo de Priamo. **Ĥrizidino** (Χρυσίδης, Χρυσήϊδα) — filino de Ĥrizo (Χρύσηος), pastro de Apolono. Legendo pri amo inter Troilo kaj Ĥrizidino estiĝis en la okcidenteŭropa mezepoko, kaj

diris. — Permesu al li, sinjoro, foriri Romon, aŭ li velkos ĉi tie. Ĉu ci scias, ke la ligia garantiulino, kiun ci al li donacis, estas retrovita kaj Vinicio, irante Ancion, lasis ŝin sub la zorgado de iu Lino? Mi ne menciis al ci pri tio, ĉar ci estis komponanta cian himnon, kaj tio estas afero pli grava ol ĉio. Vinicio volis havi ŝin kiel amatinon, sed kiam ŝi montriĝis virta, kiel Lukrecia, li enamiĝis je ŝia virto kaj nun deziras je ŝi edziĝi. Ŝi estas reĝa filino, do li ne malhonoros sin, sed li estas vera soldato: li sopiras, velkas, ĝemas, sed atendas la permeson de sia imperiestro.

— Imperiestro ne elektas edzinojn por siaj soldatoj. Por kio li bezonas mian permeson?

— Mi diris al ci, sinjoro, ke li cin adoras.

— Tiom pli li povas esti certa pri mia permeso. Ŝi estas bela knabino, sed tro mallarĝa en la koksoj. La aŭgustino Popea plendis al mi, ke ŝi malsanigis per sorĉoj nian infanon en la ĝardenoj de Palatino...

— Sed mi diris al Tigeleno, ke sorĉoj ne influas diojn. Ĉu ci memoras, dia, kiel li konfuziĝis kaj kiel ci mem kriis: *habet!*

— Mi memoras.

---

Ĝia mencio en la romano estas anakronismo. (En la okcidentaj transskriboj la nomo *Ĥrizidino* akceptis diversajn formojn, ekz-e *Crisyde*, *Cresseida* ktp; Lidja Z transskribas *Kresido*, kio en Esperanto aspektas kiel patronomo vira: «filo de Kreso»).

Kaj li sin turnis al Vinicio:

— Ĉu ci amas ŝin tiel, kiel diras Petronio?

— Mi amas ŝin, sinjoro! — respondis Vinicio.

— Do mi ordonas al ci morgaŭ senprokraste iri Romon, edziĝi al ŝi kaj ne reveni antaŭ miajn okulojn sen la edziĝa ringo.

— Dankon al ci, sinjoro, el la koro kaj el la animo.

— Ho, kiel agrable estas feliĉigi homojn, — diris Nerono. — Mi volus fari nenion alian dum la tuta vivo.

— Faru al ni ankoraŭ unu favoron, dia, — diris Petronio — kaj deklaru cian volon en la ĉeesto de la aŭgustino. Vinicio neniam kuraĝus edziĝi al knabino, kiun la aŭgustino malsimpatias, sed ci, sinjoro, dispelus per unu vorto ŝiajn malplaĉojn, sciigante, ke ci mem tion ordonis.

— Bone, — diris Nerono, — al ci kaj al Vinicio mi scius nenion rifuzi.

Li reiris al la vilao, kaj ili sekvis lin, kun koroj plenaj je ĝojo pro la venko. Vinicio devis sin deteni por ne ĵeti sin sur la kolon de Petronio, ĉar nun ĉiuj danĝeroj kaj baroj ŝajnis esti forigitaj.

En la atrio de la vilao la juna Nervo kaj Tulio Seneciono amuzis la aŭgustinon per konversacio, dum Terpno kaj Diodoro estis agordantaj la citrojn. Nerono, enirinte, sidiĝis sur seĝon, inkrustitan per testuda ŝelo, kaj flustrin-

te ion en la orelon de greka paĝio, atendis.

La paĝio baldaŭ revenis kun ora skatolo. Nerono malfermis ĝin kaj, elektinte kolĉenon el grandegaj opaloj, diris:

— Jen estas juveloj, indaj je la hodiaŭa vespero.

— La radioj de matenlumo ŝajnas brili en ili, — respondis Popea, konvinkita, ke la kolĉeno estas destinita por ŝi.

Nerono dum momento jen levadis, jen mallevadis la rozkolorajn gemojn, fine li diris:

— Vinicio, donacu en mia nomo tiun ĉi kolĉenon al la juna ligia reĝidino, je kiu mi ordonas al ci edziĝi.

Rigardo plena je kolero kaj de subita miro de Popea komencis pasadi de Nerono al Vinicio, fine ĝi haltis sur Petronio.

Sed tiu, senzorge klinita super la apogilo de sia seĝo, karesis per la mano la tenilon de harpo, kvazaŭ li volus precize fiksi en la memoro ĝian formon.

Dume Vinicio, espriminte dankon pro la donaco, proksimiĝis al Petronio kaj diris:

— Per kio mi repagos al ci tion, kion ci faris por mi hodiaŭ?

— Oferu al Eŭterpo paron da cigoj, — respondis Petronio, — laŭdu la kantojn de la imperiestro kaj ridu aŭ-

gurojn. Mi esperas, ke muĝo de leonoj ne interrompados plu dormon al ci, nek al cia ligia lilio.

— Ne, — diris Vinicio — nun mi estas tute trankvila.

— Fortuno favoru vin ambaŭ. Sed nun atentu, ĉar Nerono denove prenas formingon. Retenu la spiron, aŭskultu kaj fluigu larmojn.

Nerono efektive prenis formingon en la manon kaj levis la okulojn supren. En la ĉambro eksilentis interparoloj kaj la homoj sidis senmovaj, kvazaŭ ŝtoniĝintaj. Nur Terpno kaj Diodoro, akompanontaj Neranon, rigardis, movante la kapojn, jen unu la alian, jen lian buŝon, atendente la unuajn tonojn de la kanto.

Subite en la vestiblo iĝis movado kaj bruo, kaj momenton poste el trans la kurteno elŝovis sin unue Faono, liberigito de la imperiestro, kaj tuj post li Lekanio, la konsulo.

Nerono sulkigis la frunton.

— Pardonu, dia imperiestro, — diris Faono per spireganta voĉo, — Romo brulas! Pliparto de la urbo estas en flamoj!...

Je tiu novaĵo ĉiuj eksaltis de siaj lokoj, Nerono metis la formingon kaj diris:

— Ho dioj!... mi vidos brulantan urbon kaj finos mian

*Troica!*

Poste li sin turnis al la konsulo.

— Ĉu, forlasonte tuj Ancion, mi vidos ankoraŭ la brulegon?

— Sinjoro! — respondis la konsulo, pala kiel muro, — super la urbo estas marego da flamoj: la fumo sufokas la loĝantojn kaj la homoj svenas aŭ, freneziĝinte, ĵetas sin en la fajron ... Romo pereas, sinjoro!

Sekvis momento da silento, kiun interrompis la ekkrio de Vinicio:

— *Væ misero mihi!*<sup>171</sup>

Kaj la juna viro, deĵetinte la togon, en sola tuniko elkuris el la palaco.

Nerono levis la manojn al la ĉielo kaj vokis:

— Ve al ci, sankta urbo de Priamo!

<sup>171</sup> Voĉlegu [ve mízero mihi] (lat.) — ve al mi malfeliĉa!

## Ĉapitro 42<sup>a</sup>

Vinicio apenaŭ havis la tempon ordoni al kelkaj sklavoj, ke ili lin sekvu, poste, saltinte sur ĉevalon, li ekkuregis meze de la profunda nokto tra la malplenaj stratoj de Ancio en la direkto al Laŭrento. Atinginte sub la influo de la terura novaĵo la staton kvazaŭ de frenezo kaj de mensa sovaĝeco, li en momentoj ne konsciis klare, kio al li okazas, li nur sentis, kvazaŭ sur tiu sama ĉevalo post lia dorso sidas malfeliĉo kaj kriante en liajn orelojn: «Romo brulas» — vipas lin mem, la ĉevalon, kaj pelas ilin en tiun fajron. Metinte sian malkovritan kapon sur la ĉevalan nukon, li kuris nur en tuniko, blinde, ne rigardante antaŭen kaj ne atentante malhelpaĵojn, kontraŭ kiuj li povus frakasiĝi. Meze de la silento kaj meze de la nokto, trankvila kaj stelriĉa, la rajdanto kaj la ĉevalo, surverŝitaj de la luna brilo, similis al songa vizio. Lia idumea virĉevalo, alpremite la orelojn kaj etendinte la kolon, kuris kiel sago, pasante preter senmovaj cipresoj kaj blankaj vilaoj, kaŝitaj inter ili. La bruo de la hufoj sur la pavimplatoj vekis tie kaj ie hundojn, kiuj per bojado akompanis la strangan aperaĵon kaj poste, maltrankviligitaj de ĝia subiteco, komencis hurli, levante la kapojn al la luno. La sklavoj, rapidantaj post Vinicio, havante ĉevalojn multe malpli bon-



ajn, baldaŭ restis malantaŭe. Li mem, trakurinte, kiel uragano, la dormantan Laŭrenton, direktiĝis al Ardeo, kie, same kiel en Aricio, Boviloj kaj Ostreno, li tenis envojajn ĉevalojn por povi en plej mallonga tempo trakuri la distancon dividantan lin de Romo. Memorante pri tio, li streĝigis la lastajn fortojn de la ĉevalo.

Post Ardeo ekŝajnis al li, ke la ĉielo en la nordorienta flanko kovriĝas per roza rebrilo. Ĝi ankaŭ povis esti la matenlumo, ĉar la horo estis malfrua, kaj en julio tagiĝadas frue. Sed Vinicio ne povis deteni ekkriion de malespero kaj furiozo, ĉar ekŝajnis al li, ke ĝi estas ruĝobrilo de fajrego. Li rememoris la vortojn de Lekanio: «La tuta urbo estas maro da flamoj» — kaj dum momento li sentis, ke vere minacas lin frenezo, ĉar li perdis ĉian esperon, ke li sukcesos savi Ligian, aŭ eĉ alkuri, antaŭ ol la urbo ŝanĝos sin en amason da cindroj. Liaj pensoj iĝis nun eĉ pli rapidaj ol la galopo de la ĉevalo, kaj ili kuregis antaŭ li, kiel aro da nigraj birdoj — malesperaj kaj monstraj. Li ne sciis vere, kiu parto de la urbo komencis bruli, li tamen supozis, ke la transtibera kvartalo, plena je dense starantaj domoj, magazenoj de ligno kaj lignaj budoj, kie oni vendadis sklavojn, povis la unua iĝi viktimo de la flamoj.

En Romo sufiĉe ofte eksplodadis bruloj, kaj same ofte okazadis ĉe ili agoj perfortaj kaj rabaj, precipe en la kvar-

taloj okupataj de loĝantaro malriĉa kaj duone barbara — kio do povis okazi tie, en Transtibero, la nesto de popolaĉo, devenanta el ĉiuj flankoj de la mondo?

Ĉe tio la penso pri Urso kaj lia superhoma forto traflugis la kapon de Vinicio, sed kion povis helpi eĉ ne homo, sed titano, kontraŭ la detrua potenco de fajro?

Krome, la timo pri ebla ribelo de la sklavoj estis inkubo obsedanta Romon de multaj jaroj. Oni diradis, ke centmiloj da tiuj homoj revas pri la tempo de Spartako<sup>271</sup> kaj atendas nur taŭĝan momenton por kapti armilon kontraŭ la premantoj kaj la urbo. Kaj jen la momento venis! Povas esti, ke tie, en la urbo, krom la fajrego furiozas buĉado kaj milito. Eble eĉ la pretorianoj atakis la urbon kaj murdas laŭ ordono de la imperiestro. Kaj la haroj leviĝis subite sur la kapo de Vinicio. Li rememoris ĉiujn interparolojn pri bruloj de urboj, per kiuj oni de certa tempo kun stranga obstineco okupis sin en la imperiestra kortego, li rememoris liajn plendojn, ke li devas priskribi brulantan urbon, neniam vidinte veran urbobrulon, lian malestiman respondon al Tigeleno, kiu proponis bruligi Ancion aŭ artefaritan lignan urbon, fine liajn plendojn pro Romo kaj pro la malbonodoraj stratetoj de Suburo. Jes! Nerono mem ordonis bruligi la Urbon! Li sola povis decidiĝi je tio,

<sup>271</sup> «**Spartako**. Roma sklavoj, kiu kun samsortanoj organizis ribelon kontraŭ Romo (71 a.K.)» [NPIV] (lat. *Spartacus*)

same kiel la sola Tigeleno povis entrepreni plenumon de tia ordono. Kaj se Romo brulas laŭ la ordono de Nerono, kiu povas garantii, ke ankaŭ la loĝantaro ne estos laŭ lia ordono elmurdita? La monstro estis kapabla ankaŭ je tia faro. Sekve brulo, ribelo de la sklavoj kaj buĉado! Ia terura ĥaoso! Ia elkateniĝo de detruaj elementoj kaj de homa furiozo, kaj en ĉio tio — Ligia!

La ĝemoj de Vinicio miksis sin kun la stertorado kaj ĝemoj de la ĉevalo, kiu, kurante la vojon leviĝantan senĉese supren ĝis Aricio, galopis jam per la lasta spiro. Kiu ŝin elŝiros el la brulanta urbo kaj kiu povas ŝin savi? Ĉe tiu penso Vinicio, kuŝiĝinte tute plate sur la ĉevalo, enigis la fingrojn en siajn harojn, preta mordi pro doloro la ĉevalan nukon. Sed en tiu momento iu rajdanto, ankaŭ rapideganta, kiel ventego, sed en la kontraŭa direkto, al Ancio, ekkriis, pasante preter li: «Romo pereas!» kaj forrajdis pluen. La orelojn de Vinicio atingis nur ankoraŭ la vorto «dioj», ĉar la ceteron obtuzigis la bruo de la ĉevalaj hufumoj. Sed tiu vorto rekonsciigis lin. La dioj! Vinicio levis subite la kapon kaj, etendinte la brakojn al la ĉielo, inkrustita per steloj, komencis preĝi:

«Ne vin mi alvokas, kies temploj flamas, sed cin, Sinjoro! Ci mem suferis, ci sola estas kompatema! Ci sola komprenas la homan doloron! Ci venis en la mondon por

instrui al la homoj kompaton, do elmontru ĝin nun. Se ci estas tia, kiel diras Petro kaj Paŭlo, savu al mi Ligian. Prenu ŝin sur la brakojn kaj elportu el la flamoj. Ci ĝin povas. Redonu ŝin al mi kaj mi donos al ci mian sangon. Kaj se por mi ci tion ne volas fari, faru tion por ŝi. Ŝi cin amas kaj fidas al ci. Ci promesas vivon post la morto kaj feliĉon, sed la feliĉo post la morto ne pasos preter ŝi, kaj ŝi ne volas ankoraŭ morti. Lasu ŝin vivi. Prenu ŝin sur la brakojn kaj elportu el Romo. Ci povas, se nur ci ne malvolas...»

Kaj li interrompis, ĉar li sentis, ke plua preĝo povus ŝanĝi sin en minacon, kaj li timis ofendi Dion en la momento, kiam li bezonis plej multe lian kompaton kaj favoron. Li ektimis la nuran penson pri tio kaj por ne allasi al la kapo eĉ ombron de minaco, li komencis denove vipi la ĉevalon, tiom pli, ke la blankaj muroj de Aricio, kiu kuŝis duonvoje al Romo, ekbrilis jam antaŭ li en la luna lumo.

Post certa tempo li preterkuris plengalope templon de Merkuro, kiu staris en bosko antaŭ la urbo. Evidente oni jam sciis ĉi tie pri la malfeliĉo, ĉar antaŭ la templo regis neordinara movado. Vinicio rimarkis trakure sur la ŝtuparo kaj inter la kolonoj amasojn da homoj, lumhelpantaj sin per torĉoj, kiuj svarmis sub la gardon de la dio. Ankaŭ la vojo estis nek tiel senhoma, nek tiel libera, kiel post Ar-

deo. La amasoj, vere, rapidis en la boskon per flankaj irejoj, sed ankaŭ sur la ĉefa strato staris aretoj, kiuj rapide flankiĝadis antaŭ la galopanta rajdanto. El la urbo oni aŭdis rebruon de voĉoj. Vinicio falis inter la starantojn, kiel uragano, renversante kaj hufpremante envoje kelkajn homojn. Ĉirkaŭ li eksonis nun la krioj: «Romo brulas! La Urbo staras en fajro! Dioj, savu Romon!»

La ĉevalo duonfalas kaj, retenita per la forta mano, kliniĝis posten antaŭ gastejo, en kiu Vinicio tenis ŝanĝocele alian ĉevalon. Liaj sklavoj, kvazaŭ atendante alvenon de la mastro, staris antaŭ la gastejo kaj je lia ordono ekkuris, kvazaŭ vete, por alkonduki novan ĉevalon. Vinicio dume, vidante taĉmenton, konsistantan el dek rajdaj pretorianoj, kiuj videble rapidis kun la novaĵo el la Urbo en Ancion, ĵetis sin al ili kaj komencis demandi:

— Kiu parto de la Urbo brulas?  
— Kiu ci estas? — demandis la dekestro.  
— Vinicio, arma tribunuso kaj aŭgustano! Respondu, je cia kapo!

— La brulo eksplodis en la butikoj ĉe la Granda cirko, sinjoro. Kiam oni nin elsendis, la mezo de la urbo jam staris en fajro.

— Kaj Transtibero?  
— La flamo tien ĝis nun ne atingis, sed kun neregebla

forto ĝi ekposedas ĉiam pliajn kvartalojn. La homoj peras de la varmego kaj fumo kaj nenia helpo estas ebla.

En la sama momento oni alkondukis novan ĉevalon. La juna tribunuso eksaltis sur ĝin kaj ekgalopis pluen.

Li nun rajdis al Albano, lasante dekstre Albalongon kaj ĝian grandiozan lagon. La ŝoseo al Aricio kondukis supren, sur monta deklivo, kiu tute kovris la horizonton kaj la transe kuŝantan Albanon. Vinicio tamen sciis, ke atinginte la supron, li ekvidos ne nur Bovilon kaj Ustrinon, kie lin atendis novaj ĉevaloj, sed ankaŭ Romon, ĉar post Albano etendis sin ambaŭflanke de la Appia vojo la ebena, malalta Kampanio, sur kiu tiris sin nur la arkadoj de akveduktoj kaj nenio plu kovris la vidaĵon.

«De la supro mi vidos la flamojn» — li diris al si.

Kaj denove li komencis vipi la ĉevalon.

Sed antaŭ ol li alkuris la montsupron, li eksentis sur la vizaĝo blovon de vento, kaj kun ĝi la odoro de fumo atingis lian nazon.

Kaj subite ankaŭ la montpinto komencis orbrili.

«La brulbrilo!» ekpensis Vinicio.

La nokto tamen estis jam delonge paliĝanta, la grizo ŝanĝis sin en tagiĝon kaj sur ĉiuj proksimaj altaĵoj brilis ankaŭ oraj rozkoloroj, kiuj povis deveni same de la brulo, kiel de la matenlumo. Vinicio alkuris la montsupron kaj

tiam terura vidaĵo frapis liajn okulojn.

La tuta ebenaĵo estis kovrita de fumo, formantaj kvazaŭ unu grandegan, tuj ĉe la tero kuŝantan nubon, en kiu malaperis la urboj, akveduktoj, vilaoj, arboj, kaj en la fino de tiu griza ebenaĵo brulis sur la montetoj la urbo.

La fajrego tamen ne havis la formon de flama kolono, kiel okazas tiam, kiam brulas unu, eĉ plej granda konstruaĵo. Ĝi estis pli ĝuste longa rubando, simila al matenruĝo.

Super tiu rubando flugpendis tavolo da fumo, kelkloke tute nigra, kelkloke nuancanta rozkoloro kaj sange, kompakta, plumblovita, densa kaj volviĝanta kvazaŭ serpento, kiu kuntiriĝas kaj longiĝas. Tiu monstra tavolo ŝajnis momente kovri la fajran rubandon, tiel ke ĝi iĝadis mallarĝa, kiel pasamento, sed iafoje tiu rubando tralumis desube la fumon, ŝanĝante ĝiajn subajn volvaĵojn en flamajn ondojn. Ambaŭ tiriĝis de unu ekstremo de la horizonto ĝis la alia, fermante ĝin tiel, kiel ĝin fermas iafoje arbora zono. La Sabenajn montojn oni tute ne vidis.

Je la unua rigardo ŝajnis al Vinicio, ke brulas ne nur la urbo, sed la tuta mondo, kaj ke neniu viva estaĵo povas savi sin el tiu oceano da fajro kaj fumo.

La vento blovis ĉiam pli forte flanke de la urbo, portante brulodoron kaj fumnebulon, kiu komencis kovri de la okuloj eĉ pli proksimajn objektojn. La tago iĝis plen-

luma kaj la suno heligis la montpintojn, ĉirkaŭantajn la Albanan lagon. Sed la hele oraj matenaj radioj ŝajnis tra la fumnebulo kvazaŭ rustaj kaj malsanaj. Vinicio, mallevante sin al Albano, enrajdis en fumojn ĉiam pli densajn kaj ĉiam pli kompaktnajn. La urbeto mem estis kvazaŭ dro-nanta en ili. La maltrankvilaj loĝantoj amasiĝadis sur la stratoj, kaj terure estis pensi, kio devas okazi en Romo, se jam ĉi tie malfacile estis spiri.

Malespero denove ekregis Vinicion kaj teruro komen-cis hirtigi la harojn sur lia kapo. Sed li penis kuraĝigi sin, kiel li povis. «Ne estas ebla, — li pensis, — ke la tuta urbo komencis bruli samtempe. La vento blovas de la nordo kaj puŝas la fumojn nur en tiun direkton. En la alia flanko ili ne estas. Transtibero, apartigita per la rivero, restis eble tute sendifekta, kaj ĉiuokaze sufiĉus al Urso penetri kun Ligia tra la Janikula pordego por saviĝi de la danĝero. Ne-eble estas ankaŭ, ke la tuta loĝantaro pereu kaj ke la urbo, kiu regas la mondon, estu forviŝita kun sia popolo de la supraĵo de la tero. Eĉ en atakprenataj urboj, kiam furiozas kune buĉado kaj brulo, certa nombro da homoj ĉiam rest-as viva, kial do nepre pereu Ligia? Gardas ŝin ja Dio, kiu mem venkis la morton.» Tiel rezonante, li komencis de-nove preĝi, kaj laŭ la moro, al kiu li kutimis, li faris al Kri-sto grandajn votojn, kun promesoj de donacoj kaj oferoj.



Trakurinte Albanon, kies preskaŭ tuta loĝantaro sidis sur tegmentoj kaj arboj por rigardi Romon, li iom trankviliĝis kaj reakiris la sinregadon. Li ekpensis ankaŭ, ke Ligian gardas ne nur Urso kaj Lino, sed ankaŭ Petro la apostolo. Ĉe la nura rememoro pri tio kuraĝo venis en lian koron. Petro estis por li ĉiam persono nekomprenebla, preskaŭ superhoma. De la momento, kiam li aŭdis lin en Ostriano, restis al li stranga impresio, pri kiu li skribis al Ligia en la komenco de sia restado en Ancio: ke ĉiu vorto de tiu maljunulo estas vera, aŭ devas iĝi vera. La pli proksima konaĵo kun la apostolo dum la malsano plifortigis ankoraŭ tiun impreson, kiu poste ŝanĝis sin en neŝanceblan kredon. Se do Petro benis lian amon kaj promesis al li Ligian, Ligia ne povis pereji en la flamoj. La urbo povas forbruli, sed neniu fajrero el la flamoj falos sur ŝian veston. Sub la influo de la sendorma nokto, furioza galopado kaj emocioj Vinicion ekregis nun stranga ekzaltiteco, en kiu ĉio ŝajnis al li ebla: Petro krucosignos la flamojn, malfermos ilin per unu vorto, kaj ili trairos sendanĝere tra aleo el fajro. Petro sciis, krome, multajn venontajn aferojn, do sendube li antaŭvidis ankaŭ la brulkatastrofon, kaj en tiu okazo ĉu li povus ne elkonduki el la urbo la kristanojn, kaj inter ili Ligian, kiun li amis, kiel propran infanon? Kaj ĉiam pli forta espero komencis eniri en la koron de Vinicio. Li ek-

pensis, ke se ili forkuras el la urbo, li eble trovos ilin en Boviloj aŭ renkontos survoje. Eble en plej proksima momento la amata vizaĝo aperos el tiuj fumoĵoj, etendantaj sin ĉiam pli vaste en la tuta Kampanio.

Tio ŝajnis al li tiom pli versimila, ke sur la vojo li komencis renkonti ĉiam pli da homoj, kiuj, forlasinte la urbon, direktis sin al la Albana montaro, por, savinte sin de la fajro, poste eliĝi ankaŭ trans la limojn de la fumoĵoj. Ne atinginte ankoraŭ Ustrinon, li devis malrapidigi la ĉevalon pro ŝtopiteco de la vojo. Krom piedirantoj kun portaĵoj sur la dorsoj li renkontadis ŝargitajn ĉevalojn, mulojn, veturilojn plenajn je aĵoj, kaj fine portilojn, en kiuj sklavoj portis pli riĉajn loĝantojn. Ustrino estis jam tiel pleneĝa de la forkurintoj el Romo, ke malfacile estis trapuŝi sin tra la amaso. La ĉefplaco, la subarkadoj de temploj kaj la stratoj svarmis de la forkurintoj. Tie kaj ie oni komencis aranĝi tendojn, donontajn rifuĝojn al tutaj familioj. Aliaj homoj tendosidis sub la libera ĉielo, kriante, alvokante la diojn aŭ malbenante la sorton. En la ĝenerala teruriteco malfacile estis ion demandi. La homoj, al kiuj Vinicio sin turnis, aŭ tute al li ne respondadis, aŭ levadis al li okulojn duonfrenezajn pro teruro, respondante, ke pereas la urbo kaj la mondo. Flanke de Romo alfluadis ĉiam novaj amasoj, konsistantaj el viroj, virinoj kaj infanoj, kiuj pligrand-

igadis la konsternon kaj lamentadon. Kelkaj, perdinte en la interpremo unuj aliajn, serĉis malespere la perditojn. Aliaj batalis pro tendolokoj. Aroj da duonsovaĝaj paŝtistoj el Kampanio alvenis en la urbeton, serĉante novaĵojn aŭ profitojn el ŝteloj, kiujn faciligis la tumulto. Tie kaj ie amaso, konsistanta el ĉiunaciaj sklavoj kaj gladiatoroj, komencis prirabi la vilaojn kaj palacojn en la urbo kaj batali kontraŭ soldatoj, defendantaj la loĝantojn.

Senatano Junio, kiun Vinicio rimarkis apud gastejo ĉirkaŭitan de taĉmento da batavaj sklavoj, la unua donis al li iom pli precizan informon pri la brulego. La fajro komenciĝis efektive ĉe la Granda cirko, en la loko, kiu tuŝas Palatinon kaj la monteton Celio, sed ĝi disvastiĝadis kun nekomprenebla rapideco, tiel ke ĝi ekposedis la tutan mezon de la urbo. Ankoraŭ neniam de la tempo de Brenno<sup>272</sup> la urbon trafis tia terura katastrofo.

— La tuta cirko forbrulis, same la ĉirkaŭantaj ĝin butikoj kaj domoj, — diris Junio. — Aventino kaj Celio estas en fajro. La flamo, ĉirkaŭinte Palatinon, venis al Karinoj...

Ĉe tio Junio, kiu posedis ĉe Karinoj belegan domon, plenan je artverkoj, kiujn li pasie amis, kaptis plenmanon da malpura polvo kaj, ŝutinte ĝin sur la kapon, komencis dum momento malespere ĝemi.

<sup>272</sup> *Brennos* aŭ *Brennus* estis la militestro de gaŭloj, kiuj en la jaro 390<sup>a</sup> aŭ 387<sup>a</sup> a.K. venkoprenis kaj forbruligis Romon.

Sed Vinicio ekskuis lin je la ŝultroj.

— Ankaŭ mia domo staras ĉe Karinoj, — li diris, — sed kiam ĉio pereas, ankaŭ ĝi pereu.

Poste, rememorinte, ke Ligia, sekvante lian konsilon, povis esti translokiĝinta en la domon de Aŭlo, li demandis:

— Kaj la strato Patricia?

— En fajro! — respondis Junio.

— Kaj Transtibero?

Junio rigardis lin kun miro.

— Ne gravas Transtibero, — li respondis, premante per la manoj la dolorantajn tempiojn.

— Por mi Transtibero pli gravas ol la tuta Romo, — ek-kriis ekscite Vinicio.

— Ci ĝin eble atingos nur tra la Havena Vojo, ĉar apud Aventino la varmego cin sufokos ... Transtibero?... Mi ne scias. La fajro ŝajne ne povis ankoraŭ esti tien veninta, sed ĉu en tiu ĉi momento ĝi jam ne venis, sole la dioj scias...

Ĉe tio Junio ekhezitis momente, poste li diris per mal-laŭta voĉo:

— Mi scias, ke ci min ne perfidos, do mi diras al ci, ke ĝi ne estas ordinara brulo. Oni ne lasis savi la cirkon ... Mi mem aŭdis ... Kiam la domoj ĉirkaŭe komencis flami, mil-

oj da voĉoj kriis: «Morton al savantoj!» Iuj homoj trakuras la urbon kaj ĵetas flamantajn torĉojn en domojn ... Aliflanke la popolo tumultas kaj vokas, ke la urbo brulas laŭ ordono. Nenion pli mi diros. Ve al la urbo, ve al ni ĉiuj kaj al mi! Kio okazas tie, la homa lango ne povas esprimi. La loĝantoj pereas en la fajro, aŭ murdas sin reciproke en la interpremo. Ĝi estas la fino de Romo!

Kaj denove li komencis ripeti: «Ve! Ve al la urbo kaj al ni!» — sed Vinicio eksaltis sur la ĉevalon kaj ekiris plu antaŭen sur la Appia vojo.

Sed ĝi estis pli ĝuste trapuŝigado meze de rivero da homoj kaj veturiloj, kiu fluis el la urbo. Klare, kvazaŭ sur manplato, kuŝis nun antaŭ Vinicio la urbo, flamanta en monstra brulego ... Flanke de la fajro kaj fumo radiis terura varmego, kaj la homaj krioj ne povis superbrui la sibiladon kaj krakadon de la flamoj.

## Ĉapitro 43<sup>a</sup>

Laŭgrade kiel Vinicio proksimiĝadis al la urbaj muregoj, montriĝis, ke pli facile estis veni al Romo ol penetri en la urbon. Sur la Appia vojo malfacile estis trapuŝiĝi pro la interpremo de homoj. La domoj, kampoj, tombejoj, ĝardenoj kaj temploj, trovantaj sin ĉe ĝiaj ambaŭ flankoj, estis ŝanĝitaj en tendolokojn. En la templo de Marso, staranta tuj apud la pordego Appia, la amaso elrompis la pordon por trovi interne rifuĝon por la nokto. En la tombejoj oni prenadis en posedon pli grandajn maŭzoleojn kaj batis pro ili, verŝante eĉ iafoje sangon. Ustrino kun sia malordo apenaŭ donis ioman antaŭguston de tio, kio okazis ĉe la muroj de la urbo mem.

Ĉesis ĉiaj konsideroj al la aŭtoritato de la leĝo, al oficoj, al familiaj ligoj, al diferencoj de la statoj. Oni vidis sklavojn, kiuj bastonis civitanojn. Gladiatoroj, ebriaj de vino, rabita en Emporio, kuniĝinte en grandajn arojn, trukuradis kun sovaĝaj krioj apudvojajn placojn, dispelante la homojn, piedpremante, rabante. Multegaj barbaroj, sklavvendotaj en la urbo, forkuris el la vendobudoj. La brulo kaj pereado de la urbo estis por ili kune la fino de la sklaveco kaj la horo de venĝo, tial, dum la urba loĝantaro, kiu perdis en la brulo sian tutan havaĵon, malespere eten-

dadis la manojn al la dioj, vokante pri savo, ili kun ĝoja hurlado batis la amasojn, deŝirante al homoj la vestojn de la ŝultroj kaj forkaptante pli junajn virinojn. Kun ili unuigis sklavoj, delonge jam servantaj en Romo, mizeruloj, posedantaj nenion krom lana zonaĵo ĉirkaŭ la koksoj, teruraj figuroj el suspektindaj kvartaloj, kiujn oni neniam vidis tage sur la stratoj kaj kies ekziston en Romo oni preskaŭ ne povis supozi. Tiu amaso, konsistanta el azianoj, afrikanoj, grekoj, tracoj, ĝermanoj kaj britoj, krieganta ĉiujn lingvojn de la tero, sovaĝa kaj senbrida, furiozis, opiniante ke venis la momento kiam ĝi rajtas rekompenci al si la jarojn da suferoj kaj mizero.

Meze de tiu ondanta homamaso, en la lumo de la tago kaj de la brulego tie kaj ie brilis la kaskoj de pretorianoj, sub kies gardon rifuĝis pli trankvilaj loĝantoj, kaj kiuj multloke devis iri atake kontraŭ la brutsimilan sovaĝularon. Vinicio vidadis en sia vivo atakprenatajn urbojn, sed neniam liaj okuloj rigardis spektaklon, en kiu malespero, doloro, larmoj, ĝemoj, sovaĝa ĝojo, frenezo, furiozo kaj senbrideco miksiĝis kune en tian senliman ĥaoson. Kaj super tiu ondanta, freneza homamaso bruegis la brulo, flamis sur la montaĵoj la plej granda urbo de la mondo, sendante en la konfuzon sian fajran spiron kaj kovrante ĝin per fumoj, tra kiuj oni ne plu vidis la bluan de la ĉielo.

La juna tribunuso, kun plej granda fortostreĉo endanĝerigante ĉiumomente la vivon, atingis fine ĝis la pordego Appia, sed tie li ekvidis, ke tra la kvartalo de la pordego Kapena li ne povos penetri en la urbon, ne nur pro la homamaso, sed ankaŭ pro terura varmego, de kiu tuj post la pordego tremis la aero. Krome la ponto apud la Triobla pordego, kontraŭ la templo *Bonæ Deæ*<sup>273</sup>, ankoraŭ ne ekzistis, volante do penetri trans Tiberon, oni devis trapremi sin ĝis la Fostoponto<sup>274</sup>, tio estas pasi preter Aventino, la urboparto surverŝita de maro da flamoj. Tio estis tute nebla. Vinicio komprenis, ke li devas reiri en la direkton al Ustrino, tie flankiĝi de la Appia vojo, transriveriĝi antaŭ la urbo kaj atingi la Vojon Havenan, kiu kondukis rekte al Transtibero. Ankaŭ tio ne estis facila afero kaŭze de la ĉiam pli granda interpremo reganta sur la Vojo Appia. Trabati al si tie la vojon oni povus nur eble per glavo, sed Vinicio ne havis armilon, ĉar li forveturis el Ancio tiel, ki- el la novaĵo pri la brulo trafis lin en la imperiestra vilao. Tamen ĉe la Fonto de Merkuro li ekvidis konatan centes- tron de pretorianoj, kiu fronte de kelkdeko da soldatoj ba- ris aliron al la teritorio de la templo. Vinicio ordonis al la

<sup>273</sup> *Bona Dea*, gen. kaj dat. *Bonæ Deæ* /bone dee/ (lat.) — en la Roma mi- taro, Bona Diino, la diino de ĉasteco kaj fekundeco de romaninoj.

<sup>274</sup> La Fostoponto (lat. *Pons Sublicius*), la plej malnova ponto de Romo konstruita sur fostoj (lat. *sublica*). Ĝi ne plu ekzistas. (Senkeviĉo tradukis la nomon: *do mostu Palowego*, Lidja Z ĝin relatinigis.)



centestro sekvi lin, kaj tiu, rekoninte la tribunuson kaj aŭgustanon, ne kuraĝis kontraŭstari al la ordono.

Vinicio mem prenis la komandon de la taĉmento, kaj forgesinte ĉi-momente la instruojn de Paŭlo pri amo al proksimulo, li puŝis kaj distranĉadis antaŭ si la amason kun rapideco pereiga por multaj, kiuj ne sciis flankiĝi ĝustatempe. Postkuris lin malbenoj kaj hajlo da ŝtonoj, sed li ne atentis tion, dezirante rapide penetri en pli liberajn lokojn. Tamen ili povis antaŭeniĝadi nur treege malfacile. La homoj, kiuj jam lokiĝis tendare, ne volis cedi la vojon al la soldatoj, laŭte insultante la imperiestron kaj la pretorianojn. Ialoke la amaso alprenadis minacan sintenon. La orelojn de Vinicio atingadis voĉoj, akuzantaj Neronon pri fajrigo de la urbo. Oni malkaŝe minacis morton al li kaj al Popea. La ekkrioj: «*sannio!*», «*histrion!*» (arlekeno, aktoro) «*patrinmortiginto!*» aŭdiĝadis ĉirkaŭe. Kelkaj vokis, ke oni lin trenu en Tiberon, aliaj, ke Romo elmontris sufiĉe da pacienco. Evidente estis, ke la minacoj povas ŝanĝi sin en malkaŝan ribelon, kiu, se nur troviĝus gvidanto, povus ĉiumomente eksplodi. Dume la furiozo kaj malespero de la amasoj turnadis sin kontraŭ la pretorianojn, kiuj ankaŭ tial ne povis eliĝi el la interpremo, ke la vojon baris tutaj montoj da objektoj, rapide elĵetitaj el la brulo: kestoj kaj bareloj kun manĝaĵoj, iom valoraj mebloj, vazoj, infanaj

ludiloj, litaĵoj kaj manportiloj.

Tie kaj ie sekvis eĉ malgrandaj bataloj, sed la pretoriajnoj rapide dispeladis la senarman amason. Trarajdinte kun peno transverse la vojojn Latinan, Numician, Ardean, Lavinian kaj Ostian, ĉirkaŭirinte vilaojn, ĝardenojn kaj templojn, Vinicio atingis fine urbeton nomatan *Vicus Alexandri*, post kiu li transiĝis sur la alian bordon de Tibero. Estis tie malpli da interpreto kaj malpli da fumo. De forkurintoj, kiuj tamen ankaŭ tie ne mankis, li eksciis, ke nur kelkajn stratetojn de Transtibero ekposedis la brulo, sed ke certe nenion ŝparos la potenco de la fajro, ĉar estas homoj, kiuj ĝin intence submetas, kriante, ke ili faras tion laŭ ordono. La juna tribunuso nun havis jam nenian dubon, ke efektive Nerono ordonis bruligi Romon, kaj la venĝo, pri kiu vokis la amasoj, ŝajnis al li afero prava kaj justa. Kion pli povus fari Mitridato aŭ iu el plej furiozaj malamikoj de Romo? La mezuro estis superplena, la frenezo iĝis tro monstra kaj la homa vivo kontraŭ ĝi — nebla. Vinicio ankaŭ kredis, ke la lasta horo de Nerono ekbatis, ke tiuj ruboj, en kiujn disfalas la urbo, devas nepre tombokovri la monstran arlekenon kune kun ĉiuj liaj krimoj. Se troviĝus viro sufiĉe kuraĝa por ekstari fronte de la ĉiopreta pro malespero popolo, tio povus okazi en la daŭro de kelkaj horoj. Tiam kuraĝaj kaj venĝemaj pensoj ko-

mencis trakuri la kapon de Vinicio. Kaj se tion farus li mem? La gento de Vinicioj, kiu ĝis la lasta tempo kalkulis vicojn da konsuloj, estis konata en la tuta Romo. La amasoj bezonis nur nomon. Foje ja, pro la mortkondamno de la kvarcent sklavoj de la prefekto Pedanio Sekundo, preskaŭ eksplodis ribelo kaj civila milito, kio do okazus hodiaŭ pro la terura batego superanta preskaŭ ĉiujn, kiujn Romo spertis en la daŭro de ok jarcentoj?

«Kiu vokos la *kviritojn* al armilo, — pensis Vinicio, — tiu sendube faligos Neronon kaj mem surmetos la purpuron.» Kial do li ne faru tion? Li estis pli energia, pli brava kaj pli juna ol la aliaj aŭgustanoj ... Nerono havis, vere, je sia dispono tridek legiojn, postenantajn ĉe la limoj de la ŝtato, sed ĉu ankaŭ tiuj legioj kaj iliaj ĉefoj ne ekribelos, aŭdinte pri la bruligo de Romo kaj de ĝiaj temploj? Kaj en tiu okazo li, Vinicio, povus iĝi imperiestro. Oni ja flustris inter la aŭgustanoj, ke iu aŭguristo antaŭdiris la purpuron al Otono. Per kio li malsuperas Otonon? Eble ankaŭ Kristo helpus lin per sia Dia potenco, eble ĝi estas lia inŝpiro? «Ho, se tiel estus!» vokis Vinicio interne. Li venĝus tiam kontraŭ Nerono la danĝeron de Ligia kaj sian maltrankvilon, li enkondukus regadon de justeco kaj vero, disvastigus la instruon de Kristo de Eŭfrato ĝis la nebulaj bordoj de Britujo, kaj kune li vestus Ligian per la

purpuro kaj farus ŝin reĝino de la tero.

Sed tiuj pensoj, eksplodinte el lia kapo, kiel hajlo da fajreroj el brulanta domo, estingiĝis, kiel fajreroj. Antaŭ ĉio necesis savi Ligian. Nun li rigardis la katastrofon de proksime, do denove timo lin ekregis; kaj kontraŭ tiu maro da fajro kaj fumo, ĉe la renkontiĝo kun la terura realeco, tiu fido, kun kiu li kredis, ke Petro la apostolo savos Ligian, formortis en lia koro. Malespero kaptis lin refoje, do penetrante sur la vojon Havenan, kondukantan rekte al Transtibero, li remoderiĝis nur en la pordego, ĉe kiu oni ripetis al li tion, kion antaŭe diris la forkurintoj, ke pliparto de tiu kvartalo ne estis ankoraŭ ekposedita de la brulo, kvankam la fajro kelkloke transportiĝis trans la riveron.

Tamen ankaŭ Transtibero estis plena je fumo kaj de forkurantaj amasoj, tra kiuj estis pli malfacile penetri en la fundon de la kvartalo tial, ke la homoj, havante pli da tempo, elportadis kaj savadis pli da objektoj. La ĉefa Havena vojo mem estis multloke ŝtopita per ili, kaj apud la Naŭmaĥiejo de Aŭgusto<sup>275</sup> ili levis sin en tutaj amasoj. Pli malvastaj stratetoj, kie pli dense amasiĝis la fumo, estis simple neenireblaj. La loĝantoj forkuradis el ili milope. Vinicio vidis envoje terurajn bildojn. Plurfoje du homaj

<sup>275</sup> Artefarita lageto en Transtibero, aranĝita laŭ ordono de Aŭgusto por prezenti naŭmaĥiojn (gladiatorajn ŝipbatalojn, de la greka ναυμαχία).

riveroj, fluantaj el kontraŭaj direktoj, premegis unu la alian kaj batalis je vivo aŭ morto. Familioj perdiĝadis en la tumulto, patrinoj malespere vokis siajn infanojn. La haroj de Vinicio hirtiĝadis je la penso, kio devis okazi pli proksime al la fajro. Meze de la krioj kaj ĥaoso malfacile estis ion eldemandi aŭ kompreni la vokojn. Ifoje el trans la rivero alruliĝadis novaj ondegaj da fumoj nigraj kaj tiel pezaj, ke ili ruliĝis tuj super la tero, tiel kovrante la domojn, homojn kaj ĉiujn objektojn, kiel ilin kovras nokto. Sed vento, kaŭzita de la brulo, disblovadis ilin, kaj tiam Vinicio povis antaŭeniĝadi al la strateto, ĉe kiu staris la domo de Lino. La varmo de la julia tago, fortigita de la ardo, radianta el la brulantaj kvartaloj, iĝis neelportebla. La fumo mordis la okulojn, al la brustoj mankis spiro. Eĉ tiuj loĝantoj, kiuj, esperante, ke la fajro ne transportiĝos trans la riveron, restis ĝis nun en siaj hejmoj, komencis ilin forlasi kaj la amasego kreskis kun ĉiu horo. La pretorianoj, akompanantaj Vinicion, restis malantaŭe. En la interpremo iu vundis per martelo lian ĉevalon, kiu komencis svingi la sangantan kapon, levi sin sur la postaj piedoj kaj malobei la rajdanton. Laŭ lia riĉa tuniko oni rekonis en li aŭgustanon, kaj ĉirkaŭe tuj aŭdiĝis la ekkrioj: «Morton al Nerono kaj al liaj bruligistoj!» Venis momento de gravega danĝero, ĉar centoj da manoj etendis sin al Vinicio, sed la

timigita ĉevalo forportis lin, hufpremante la homojn, kaj samtempe alfluis nova ondo da nigra fumo kaj kovris la straton per krepusko. Vinicio, vidante, ke li ne trarajdos, desaltis fine sur la teron kaj komencis piedkuri, glitante apud la muroj kaj iafoje atendente, ke la forkuranta amaso pasu preter li. En la animo li parolis al si, ke tio estas vanaj penoj. Ligia povis jam esti ekster la urbo, ŝi povis ĉi-momente savi sin per forkuro: pli facile estus trovi pinglon ĉe marbordo ol ŝin en tiu interpremo kaj ĥaoso. Li volis tamen eĉ por la prezo de la vivo atingi la domon de Lino. Iafoje li haltadis kaj frotis la okulojn. Forŝirinte la randon de sia tuniko, li ŝirmis per ĝi la nazon kaj la buŝon kaj kuris pluen.

Laŭgrade kiel li proksimiĝadis al la rivero, la varmego kreskis terure. Vinicio, sciante, ke la brulo komenciĝis ĉe la Granda cirko, kredis komence, ke tiu ardo venas de ĝiaj restaĵoj, de la Bova Forumo kaj de Velabro, kiuj, kuŝante proksime, ankaŭ estis sendube posedataj de flamoj. Sed la varmego iĝadis jam neelportebla. Iu forkuranto, la lasta, kiun Vinicio rimarkis, maljunulo kun lambastonoj, ekkriis: «Ne proksimiĝu al la ponto Cestia! La tuta insulo brulas!» Efektive, oni ne povis plu havi iajn iluziojn. Ĉe la vojturniĝo al la strato Juda, kie staris la domo de Lino, la juna tribunuso ekvidis meze de nubo da fumoj flamon:

brulis ne nur la insulo, sed ankaŭ Transtibero, almenaŭ la alia fino de la strateto, ĉe kiu Ligia loĝis ... Vinicio memoris tamen, ke la domon de Lino ĉirkaŭas ĝardeno, post kiu, flanke de Tibero, kuŝis ne tre vasta kampo, libera de konstruaĵoj. Tiu penso kuraĝigis lin. La fajro povis halti en la malplena loko. Kun tiu espero li kuris pluen, kvankam ĉiu ventoblovo alportadis jam ne nur fumon, sed milojn da fajreroj, kiuj povis kaŭzi brulon en la alia fino de la strateto kaj bari la reiron.

Fine li tamen ekvidis tra la fuma vualo la cipresojn en la ĝardeno de Lino. La domoj, kuŝantaj trans la libera kampo, brulis jam, kiel lignaj ŝtiparoj, sed la dometo de Lino staris ankoraŭ netuŝite. Vinicio rigardis la ĉielon kaj ekkuris al la dometo, kvankam la sola aero kaŭzis jam al li bruldoloron. La pordo estis fermita, sed li ekpuŝis ĝin kaj enkuris internen. En la ĝardeno estis eĉ ne unu viva estaĵo, kaj ankaŭ la domo ŝajnis tute senhoma.

«Eble ili svenis de la fumoj kaj varmego», ekpensis Vinicio.

Kaj li komencis voki:

— Ligia! Ligia!

Respondis al li silento. En la mallaŭto estis aŭdebla nur krakbruo de la malproksima fajro.

— Ligia!

Subite liajn orelojn atingis tiu malserena voĉo, kiun li jam aŭdis foje en tiu ĝardeno. Sur la proksima insulo ekbrulis videble la bestejo, staranta kelkan distancon de la templo de Eskulapo, kaj ĉiaspecaj bestoj, inter ili leonoj, komencis tie muĝi pro teruro. Tremo trakuris Vinicion de la piedoj ĝis la kapo. Jam duafoje, kiam lia tuta atento estis koncentrita en la penso pri Ligia, tiuj tremigaj voĉoj eksonis, kiel antaŭdiro de malfeliĉo, kiel stranga aŭguro de malbonsorta estonteco.

Tio tamen estis mallonga, momenta impresio, ĉar pli terura eĉ ol la muĝo de sovaĝaj bestoj, la krakbruo de la brulo devigis lin pensi pri io alia. Ligia ne respondis, vere, al lia voko, sed ŝi povis trovi sin en tiu fajrominacata konstruaĵo, sveninta aŭ sufokata de fumo. Vinicio saltis internen. La malgranda atrio estis malplena kaj malluma de fumo. Palpe serĉante la pordon, kondukantan al la dormoĉambroj, li rimarkis flagrantan flameton de lampo kaj, proksimiĝinte, ekvidis lararejon, en kiu anstataŭ laroj estis kruco. Sub tiu kruco brulis la meĉlampo. La kapon de la juna kateĥizato fulmrapide trakuris la penso, ke tiu kruco sendas al li la lumon, kun kiu li povas retrovi Ligan, li prenis do la lampon kaj komencis serĉi la dormoĉambrojn. Trovinte unu el ili, li flankigis la kurtenon kaj, priluminte la ejon per la lampo, komencis rigardi.



Sed ankaŭ tie estis neniu. Vinicio tamen estis certa, ke li trafis en la ĉambro de Ligia, ĉar sur najloj, enbatitaj en la muron, pendis ŝiaj vestoj, kaj sur la lito kuŝis *capitium*, tio estas alfigura tolaĵo, kiun la virinoj portis senpere sur la korpo.

Vinicio kaptis ĝin, alpremis al la buŝo kaj, surĵetinte ĝin trans la ŝultron, iris serĉi plu. La dometo estis malgranda, do en mallonga tempo li traserĉis ĉiujn ĉambrojn, kaj eĉ la kelojn. Sed nenie li trovis vivan estaĵon. Estis tute evidente, ke Ligia, Urso kaj Lino kune kun la aliaj loĝantoj de la kvartalo serĉis en forkuro savon de la brulo. «Mi devas serĉi ilin en la amaso, ekster la urbaj pordegoj», — ekpensis Vinicio.

Ne tre multe mirigis lin la fakto, ke li ilin ne renkontis sur la Havena Vojo, ĉar ili povis eliri el Transtibero de la kontraŭa direkto, flanke al la Vatikana monteto. Ĉiuokaze ili estis savitaj, almenaŭ de la fajro. Kvazaŭ ŝtono falis de la brusto de Vinicio. Li vidis, vere, kun kiel teruraj danĝeroj estis ligita forkuro, sed la penso pri la superhoma forto de Urso inspiris al li kuraĝon. «Mi devas nun, — li parolis al si, — forkuri de ĉi tie kaj tra la ĝardenoj de Domicia atingi la ĝardenojn de Agripino. Tie mi ilin trovos. La fumo ne estas tie teruraj, ĉar la vento blovas de la Sabena montaro.»

Venis tamen plej urĝa tempo, kiam li devis pensi pri la propra savo, ĉar ondego da fajro alfluadis ĉiam pli proksimen flanke de la insulo kaj fumaj volvaĵoj kovris preskaŭ tute la strateton. La meĉlampo, per kiu li lumigadis al si la internon de la domo, estingiĝis nun de aera trablovo. Vinicio, saltinte sur la straton, kuris nun tutimpete al la Havena Vojo en la sama direkto, el kiu li venis, kaj la brulo ŝajnis persekuti lin per sia fajra spiro, jen ĉirkaŭblovante lin per ĉiam novaj nuboj da fumo, jen surŝutante per fajreroj, kiuj faladis sur liajn harojn, sur la kolon kaj veston. La tuniko komencis bruleti sur li kelkloke, sed li ne atentis tion kaj kuris pluen, timante, ke la fumo povus lin sufoki. Efektive li sentis en la buŝo la brulguston kaj fulgon, kaj lia gorgo kaj pulmoj doloris, kvazaŭ brulantaj. La sango alfluadis lian kapon, tiel ke iafoje li vidis ĉion ruĝe kaj la fumoj mem ŝajnis al li ruĝaj. Tiam li parolis al si interne: «Tio estas pura fajro! Mi ĵetu min prefere teren kaj pereu». La kurado lacigadis lin ĉiam pli. Ŝvito fluis sur liaj kapo, kolo kaj dorso, kaj tiu ŝvito lin brulvundis, kvazaŭ bolaĵo. Li falus, se ne subtenus lin la nomo de Ligia kaj se li ne havus ĉirkaŭ la buŝo ŝian *capitium*. Kelkajn momentojn poste li tamen komencis ne rekonii plu la straton, kiun li kuris. Iom post iom forlasadis lin la konscio, li nur memoris, ke li devas forkuri, ĉar sur

libera kampo lin atendas Ligia, kiun promesis al li Petro la apostolo. Kaj subite lin ekregis stranga certeco, jam duonfebra, simila al antaŭmorta vizio — ke li ŝin ekvidos, edziĝos, kaj tuj poste mortos.

Li jam estis kvazaŭ ebria, rebatante sin de unu flanko de la strato al la alia. Kaj subite io ŝanĝiĝis en la monstra fajrego, kovranta la grandegan urbon. Ĉio, kio ĝis nun nur bruletis, eksplodis videble per unu maro da flamoj, ĉar la vento ĉesis alporti fumojn, kaj tiujn, kiuj amasiĝis en la stratetoj, forblovis furioza premeĝo de brulvarma aero. Tiu premeĝo pelis nun milionojn da fajreroj, tiel ke Vinicio kuris kvazaŭ en fajra nuboj. Li povis, aliflanke, pli bone vidi antaŭ si, kaj preskaŭ en la sama momento, kiam li estis falonta, li ekvidis la finon de la strateto. Tiu vido donis al li novajn fortojn. Pasinte preter stratangulo, li troviĝis sur la strato, kiu kondukis al la Kodetana kampo. La fajreroj ĉesis lin persekuti. Li komprenis, ke se li sukcesos atingi almenaŭ la Havenan vojon, li estos savita, se li eĉ svenus poste sur la vojo.

En la fino de la strateto li ekvidis denove nubon, kiu vualis la eliron. «Se tio estas fumo», li ekpensis, «mi jam ne trapasos». Li kuris per la lastaj fortoj. Envoje li deĵetis de si la tunikon, kiu, ekbruletinte de la fajreroj, komencis lin vundi, kiel la ĉemizo de Neso<sup>276</sup>, kaj li kuris nuda, ha-

vante nur sur la kapo kaj sur la buŝo la *capitium* de Ligia. Alkurinte pli proksimen, li distingis, ke tio, kion li opiniis fumo, estis polva nubo, el kiu, krome, atingadis lin homaj voĉoj kaj krioj.

«Stratamaso rabas en la domoj» — li diris al si.

Li kuris tamen en la direkto de la voĉoj. Ĉiuokaze estis tie homoj, kiuj povis al li helpi. En tiu espero, antaŭ ol li alkuris, li komencis voki helpon per la tuta forto de la voĉo. Sed ĝi estis jam lia lasta fortostreĉo: ankoraŭ pli ruĝe iĝis antaŭ liaj okuloj, en la pulmoj ekmanĝis spiro, en la ostoj forto, kaj li falis.

Oni lin tamen ekaŭdis, aŭ pli ĝuste, ekvidis, kaj du homoj ekrapidis helpe al li kun siteloj, plenaj je akvo. Vinicio, kiu falis pro laceco, sed ne perdis la konscion, kaptis ambaŭmane la vazon kaj eltrinkis la akvon ĝisduone.

— Dankon, — li diris, — starigu min sur la piedojn, pluen mi mem iros!

La alia laboristo surverŝis lian kapon per akvo, kaj ambaŭ ne nur starigis lin sur la piedojn, sed levis lin de la tero kaj portis al la aro de la aliaj, kiuj ekĉirkaŭis lin, zorgeme esplorante, ĉu li suferis iajn gravajn kontuzojn. Tiu zorgemo mirigis Vinicion.

— Homoj, — li demandis, — kiuj vi estas?

<sup>276</sup> Gr. Νέσσοσ — la centaŭro kies venenita tuniko mortigis Heraklon.

— Ni detruas la domojn, por ke la brulo ne atingu la Havenan vojon, — respondis unu el la laboristoj.

— Vi helpis min, kiam mi estis jam falinta. Dankon al vi.

— Ni ne rajtas rifuzi helpon ... — aŭdiĝis kelkaj voĉoj. Tiam Vinicio, kiu antaŭe de la mateno vidis la brutsimilajn amasojn, batalojn kaj rabojn, rigardis pli atente la lin ĉirkaŭantajn vizaĝojn kaj diris:

— Rekompencu vin ... Kristo.

— Glorata estu lia nomo! — vokis la tuta ĥoro da voĉoj.

— Lino?... demandis Vinicio.

Sed li ne povis demandi plu kaj ne aŭdis la respondon, ĉar pro emocio kaj pro la travivitaj penoj li svenis. Li rekonsciiĝis nur en ĝardeno, sur la Kodetana kampo, ĉirkaŭita de kelkaj virinoj kaj viroj, kaj la unuaj vortoj, kiujn li kapablis eldiri, estis:

— Kie estas Lino?

Dum momento venis nenia respondo, poste iu konata al Vinicio voĉo diris subite:

— Ekster la Nomentana pordego; li iris Ostrionon antaŭ du tagoj ... Pacon al ci, persa reĝo!

Vinicio leviĝis, kaj sidiĝis, neantendite ekvidante super si Ĥilonon.

Kaj la greko diris:

— Cia domo, sinjoro, forbrulis sendube, ĉar Karinoj staras en fajro, sed ci ĉiam estos riĉa, kiel Midaso. Ho, kia malfeliĉo! La kristanoj, ho filo de Serapo, antaŭdiradis de longe, ke fajro detruos tiun ĉi urbon ... Kaj Lino kun la filino de Jovo estas en Ostriano ... Ho! Kia malfeliĉo por tiu ĉi urbo!...

Vinicio denove eksentis sin svene.

— Ci vidis ilin? — li demandis.

— Mi vidis, sinjoro ... Dankon al Kristo kaj al ĉiuj dioj, ke mi povis per bona novaĵo repagi ciajn bonfarojn. Sed mi repagos al ci plie, Oziriso, mi ĵuras je tiu ĉi brulanta Romo.

Ekstere vesperiĝadis, sed en la ĝardeno estis lume, kiel dum tago, ĉar la brulego kreskis ankoraŭ pli. Ŝajnis, ke brulas jam ne apartaj kvartaloj, sed la tuta urbo, de unu ekstremo ĝis la alia. La ĉielo estis ruĝa, kien nur la okuloj atingis, kaj la nokto, kiu vualis la mondon, iĝadis ruĝa.

# Parto tria

## Ĉapitro 44<sup>a</sup>

La ruĝobrilo de la brulanta urbo disverŝis sin sur la ĉielo tiel vaste, kiel nur la homa vido atingis.

El post la montetoj ruliĝis supren la luno, granda kaj ronda, kiu baldaŭ ekflamis de la brilo kaj, alpreninte la koloron de ardanta kupro, ŝajnis rigardi kun miro la pereon de la mondreganta urbego. En la rozaj abismoj de la ĉielo brilis rozaj steloj, sed, kontraŭe ol en la ordinaraĵoj, la tero estis pli hela ol la ĉielo. Romo, kvazaŭ grandega brulŝtiparo, lumigis la tutan Kampanion. Ĉe la sanga brilo oni vidis pluajn montetojn, urbojn, vilaojn, templojn, monumentojn kaj akveduktojn, tiriĝantajn de ĉiuj regionaj montoj al la urbo, kaj sur la akveduktoj — amasojn da homoj, kiuj tien rifuĝis por sendanĝeriĝi aŭ por rigardi la brulegon.

Dume la terura elemento ekposedadis ĉiam pli novajn kvartalojn. Oni ne povis dubi, ke iuj krimaj manoj fajrigas la urbon, ĉar ĉiam novaj bruloj eksplodadis en lokoj malproksimaj de la ĉefa fajrocentro. De la montetoj, sur kiuj Romo estis konstruita, la flamoj, kvazaŭ ondoj, fluis mal-supren en la valojn, dense kovritajn per domoj, nombran-

taj po kvin kaj ses etaĝojn, plenaj je budoj, butikoj, transporteblaj lignaj amfiteatroj, konstruitaj laŭokaze por diversaj spektakloj, fine de magazenoj de ligno, olivoleo, greno, nuksoj, piniaj strobiloj, per kies grajnoj nutris sin la malriĉa loĝantaro, kaj de vestoj, kiujn oni iafoje, laŭ imperiestra favoro, disdonadis al la ĉifonuloj, nestantaj en malvastaj strataĉoj. Tie la brulo, trovante abundon da fajrigema materialo, ŝanĝadis sin preskaŭ en vicon da eksplodoj, kaj kun neimagebla forto ekposedadis tutajn stratojn. La homoj, tendostarantaj ekster la urbo aŭ rigardantaj de sur la akveduktoj, divenadis laŭ la koloro de la flamoj, kio brulas. Furioza aerblovego levadis iafoje el la fajra dronejo milojn kaj milionojn da ardantaj ŝeloj de nuksoj kaj migdaloj, kiuj supreniĝadis kiel sennombraj aroj da lumaj papilioj, — kaj krake krevadis en la aero, aŭ, pelate de la vento, faladis sur novajn kvartalojn, sur akveduktojn kaj sur kampojn, ĉirkaŭantajn la urbon. Ĉia penso pri savo ŝajnis absurda, kaj la tumulto kreskis ĉiumomente, ĉar dum unuflanke la urba loĝantaro forkuradis tra ĉiuj pordegoj ekster la murojn, aliflanke la brulo allogis milojn da homoj el la ĉirkaŭaĵoj, tiel loĝantojn de malgrandaj urbetoj kiel vilaĝanojn kaj duonsovaĝajn paŝtistojn el Kampanio, altiratajn de la espero rabi.

La ekkrio: «Romo pereas!» sonis senĉese en la buŝoj



de la amaso, kaj la pereco de la urbo ŝajnis tiutempe kune fino kaj malligo de ĉiuj nodoj, kiuj ĝis nun kunligadis la homaron en unu tuton. La popolaĉo, en kiu al plimulto, konsistanta el sklavoj kaj fremduloj, la regado de Romo estis tute indiferenta, kaj kiun ĉia renverso povis nur liberiĝi el la katenoj, alprenadis tie kaj ie minacan sintenon. Vastiĝadis perforto kaj raboj. Ŝajnis, ke la nura spektaklo de la pereanta urbo alfiksas la homan atenton kaj retenas ankoraŭ la eksplodon de buĉado, kiu komenciĝos tuj, kiam la urbo ŝanĝos sin en cindrojn. Centmiloj da sklavoj, forgesante, ke Romo, krom la temploj kaj muroj, posedas ankaŭ kelkdek legiojn en ĉiuj flankoj de la mondo, ŝajnis nur atendi batalvokon kaj ĉefon. Oni komencis rememori la nomon de Spartako — troviĝis tamen neniu Spartako — aliflanke la civitanoj komencis sin armi, per kio ĉiu povis. Plej monstraj famoj rondiris ĉe ĉiuj pordegoj. Kelkaj asertis, ke Vulkano laŭ la ordono de Jovo detruas la urbon per fajro, eliĝanta el sub la tero; aliaj — ke ĝi estas venĝo de Vesto pro la pastrino Rubria. Homoj tiel konvinkitaj volis nenion savi, nur, svarmante al la temploj, ili petegis la diojn pri kompato. Sed plej ĝenerale oni ripetadis, ke Nerono ordonis bruligi la urbon por liberiĝi de la odoroj venantaj el Suburo kaj por konstrui novan urbon, nomotan Neronio. Je tiu ideo furiozo kaptadis la homojn, kaj se, ki-

el pensis Vinicio, troviĝus ĉefo, kiu volus elprofiti tiun eksplodon de malamo, la lasta horo de Nerono ekbatus jarojn pli frue.

Oni ankaŭ diradis, ke Nerono freneziĝis, ke li ordonis al la pretorianoj kaj gladiatoroj ataki la popolon kaj elbuĉi ĝin. Kelkaj ĵuris je la dioj, ke laŭ la ordono de la Kuprobarba estis ellasitaj la bestoj el ĉiuj bestejoj. Oni vidis sur la stratoj leonojn kun flamantaj kolharoj, furiozajn elefantojn kaj urojn, kiuj are piedpremis homojn. Estis eĉ en tio parto da vero, ĉar kelkloke elefantoj, vidante la proksimiĝantan brulon, disbatis la bestejojn kaj, liberiĝinte, kuregis en la direkto kontraŭa al la fajro, detruante ĉion antaŭ si, kiel uragano. La publika famo nombris dekmilojn da personoj, kiuj pereis en la fajro. Efektive pereis multegaj. Estis tiaj, kiuj, perdinte la tutan havaĵon aŭ plej karajn personojn, propravole ĵetis sin pro malespero en la flamojn. Aliajn sufokis la fumoj. En la mezo de la urbo, inter Kapitolo unuflanke kaj Kvirinalo, Viminalo kaj Eskivilino aliflanke, same kiel inter Palatino kaj la monteto Celio, kie la stratoj estis pli dense plenkonstruitaj, la brulo komenciĝadis en tiel multaj lokoj, ke tutaj aroj da homoj, forkurante en unu direkto, renkontadis neatendite novan flammuron de la kontraŭa flanko kaj pereadis per terura morto meze de la fajra inundo.

En la teruro, tumulto kaj konsterno oni ne sciis, fine, kien forkuri. La vojoj estis ŝtopitaj per objektoj, kaj en multaj malvastaj lokoj simple barikaditaj. Tiuj, kiuj rifuĝis sur foirejojn kaj placojn, en la loko, kie oni poste konstruis la Amfiteatron de Flavioj<sup>277</sup>, apud la templo de Tero, apud la portiko de Livia kaj pli alte, apud la temploj de Junono kaj Lucino<sup>278</sup>, same kiel inter la Deklivo Virbia kaj la malnova Eskvilina pordego, ĉirkaŭite ĉiuflanke de maro da fajro, pereis de la ardo. En la lokoj, kien la flamo ne atingis, oni trovis poste centojn da karbobruligitaj korpoj, kvankam tie kaj ie la malfeliĉuloj elŝiris pavimajn platojn kaj, por ŝirmi sin kontraŭ la varmego, eniĝis ĝisduone en la teron. Preskaŭ neniuj el la familioj, loĝantaj en la mezo de la urbo, restis senmanka, tial laŭlonge de la muroj kaj ĉe ĉiuj pordegoj oni aŭdis malesperan hurladon de virinoj, vokantaj la karajn nomojn de tiuj, kiuj pereis en la interpremo aŭ en la fajro.

Kaj tial, dum unuj petegis de la dioj la almozon de kompatato, aliaj blasfemis al ili pro la terurega malfeliĉo. Oni vidis maljunulojn, turnitajn al la templo de Jovo Liberriganto, kiuj etendante la brakojn, vokis: «Ci estas savanto, savu cian altaron kaj la urbon!»

---

<sup>277</sup> T.e. Koloseo.

<sup>278</sup> Lat. *Lucina*, epiteto aŭ sinonimo de Junono (aŭ iam de Diano), «la Lunuma diino», protektanta la akuŝantinojn.

La malespero tamen direktadis sin ĉefe kontraŭ la malnovajn romajn diojn, kiuj, laŭ la kompreno de la loĝantaro, havis la devon pli zorgeme ol aliaj gardi la urbon. Ili montriĝis senfortaj, do oni insultis ilin.

Aliflanke okazis, ke kiam sur la Vojo Azena montriĝis taĉmento da egiptaj pastroj, transkondukantaj statuon de Izido, kiun oni savis el la templo staranta proksime de la pordego Celimonta<sup>279</sup>, la amaso ĵetis sin inter la taĉmenton, kromjungis sin al la veturilo, altiris ĝin ĝis la Appia pordego kaj, kaptinte la statuon, lokis ĝin en la templon de Marso, kontuzinte ĉe tio la pastrojn de tiu lasta dio, kiuj kuraĝis kontraŭstari. En aliaj lokoj oni alvokadis Serapon, Baalon aŭ Jehovon, kies konfesantoj, elsvarminte el la stratetoj en la ĉirkaŭaĵoj de Suburo kaj Transtibero, plenigadis per krioj kaj voko la kampojn kuŝantajn apud la muroj. En iliaj krioj sonis tamen kvazaŭ tonoj de triumfo, tial do, dum unuj el la loĝantoj aliĝis la ĥoron gloran-tan «la Sinjoron de la mondo», aliaj, indignigite pro tiu ĝoja bruado, penis ĝin perforte silentigi.

Tie kaj ie oni aŭdis aĝofortajn virojn, maljunulojn, virinojn kaj infanojn, kantantajn kantojn strangajn kaj solenajn, kies signifon oni ne povis kompreni, sed en kiuj ripetiĝadis ĉiumomente la vortoj: «Jen venas la juĝisto en

<sup>279</sup> La urbopordego *Porta Caelimontana*, kiu situis sur la monteto Celio (*Caelius Mons*).

la tago de koler' kaj detruo».

Tiel la moviĝema kaj sendorma homa ondo ĉirkaŭadis la brulantan urbon, simile al maltrankvila maro.

Sed nenion helpis la malespero, nek la blasfemoj, nek la kantoj. La malfeliĉo ŝajnis nevenkebla, kompleta kaj senindulga kiel Fato. Apud la Amfiteatro de Pompeo ekbrulis la magazenoj de kanabo kaj ŝnuroj, da kiuj multege oni bezonis por la cirkoj, arenoj kaj ĉiaspecaj maŝinoj, uzataj ĉe cirkoludoj, kaj kune ekbrulis apudaj konstruaĵoj, entenantaj barelojn kun peĉo, per kiu oni ŝmiris la ŝnurojn. Dum kelkaj horoj la tuta parto de la urbo, trans kiu kuŝis la Kampo de Marso, lumis per tiel hele-flava flamo, ke al la rigardantoj, duonkonsciaj pro teruro, ŝajnis, ke konfuzita estas ankaŭ la ordo de tago kaj nokto kaj ke ili vidas la brilon de la suno. Sed poste sangoruĝa, unuaspekta brulo superis ĉiujn aliajn kolorojn de la flamoj. El la maro da fajro ŝprucadis al la brulruĝa ĉielo kvazaŭ grandegaj fontanoj kaj flamaj kolonoj, disblovante sin supre en fajrajn tufojn kaj plumojn; la vento forkaptadis ilin, ŝanĝadis en orajn fadenojn kaj harojn da fajreroj kaj portis for, super Kampanio, ĝis la Albana montaro. La nokto iĝadis ĉiam pli luma; la aero mem ŝajnis saturita ne nur de brilo, sed ankaŭ de flamo. Tibero fluis kvazaŭ rivero fajra. La malfeliĉa urbo ŝanĝis sin en inferon. La brulego ekpo-

sedadis ĉiam pli grandajn spacojn, konkeradis atake la montetojn, disverŝadis sin tra la valoj, inundadis la eben-aĵojn, furiozis, bruis, tondris.

## Ĉapitro 45<sup>a</sup>

Makreno, teksisto, en kies domon oni alportis Vinicion, lavis lin, provizis per vesto kaj nutris, post kio la juna tribunuso, plene reakirinte la fortojn, deklaris, ke ankoraŭ la saman nokton li komencos pluan serĉadon de Lino. Makreno, kiu estis kristano, konfirmis la vortojn de Hilonono, ke Lino kune kun la supera pastro, Klemenso, iris en Ostrianon, kie Petro estis baptonta tutajn arojn da adeptoj de la nova instruo. La kristanoj de la kvartalo sciis, ke Lino antaŭ du tagoj konfidis sian domon al la gardado de iu Gajo. Por Vinicio ĝi prezentis pruvon, ke nek Ligia, nek Urso restis hejme kaj ke sendube ankaŭ ili iris Ostrianon.

Tiu penso estis por li grandega konsolo. Lino estis maljunulo, al kiu malfacile estis ĉiutage iri el Transtibero trans la malproksiman Nomentanan pordegon kaj reveni de tie Transtiberon, verŝajne do li ekloĝis por tiuj kelkaj tagoj ĉe iu el la konfesantoj ekster la muroj, kaj kune kun li ankaŭ Ligia kaj Urso. Tiel ili evitis la brulegon, kiu ĝenerale ne transportiĝis al la alia deklivo de la Eskvilina monteto. Vinicio vidis en ĉio antaŭgardon de Kristo; li ek-

sentis super si lian zorgemon kaj kun koro plena je amo pli granda ol iam antaŭe, li ĵuris al li en la animo pagi per sia tuta vivo tiujn evidentajn signojn de favoro.

Tiom pli urĝe li tamen deziris atingi Ostrianon. Li retrovos Ligian, li retrovos Linon kaj Petron kaj kunprenos ilin for, en iun el siaj posedaĵoj, eĉ en Sicilion. Jen Romo flamas kaj post kelkaj tagoj restos el ĝi nur amaso da cindroj, por kio do ili restu ĉi tie, kontraŭ la katastrofo kaj kontraŭ la senbridiĝinta loĝantaro! Tie, for, ĉirkaŭos ilin taĉmentoj da disciplinemaj sklavoĵ, ĉirkaŭos ilin la sereno de la kamparo kaj ili vivos trankvile, sub la gardo de Kristo, benataj de Petro.

Li nur retrovu nun ilin!...

Sed tio ne estis facila afero. Vinicio memoris, kun kia peno li trabatis sin de la Vojo Appia en Transtiberon kaj kiel li devis rondiri por atingi la Havenan vojon, li do decidis ĉirkaŭiri nun la urbon de la kontraŭa flanko. Irante la Triumfan vojon, oni povis tien atingi, antaŭeniĝante laŭlonge de la rivero ĝis la ponto Emilia, kaj de tie, pasante preter Pincio<sup>280</sup>, laŭlonge de la Kampo de Marso, apud la ĝardenoj de Pompeo, Lukulo<sup>281</sup> kaj Salustio, penetri sur

<sup>280</sup> Pincio (lat. *Mons Pincius*), aŭ «la Ĝardena monteto», situas en la norda parto de Romo.

<sup>281</sup> «**Lukulo**. Roma generalo (1<sup>a</sup> jc a.K.), famiĝinta pro sia emo al lukso kaj gastronomio» [NPiV] (lat. *Lucullus*)

la Vojon Nomentanan. Tio estis la plej mallonga vojo, sed same Makreno, kiel Ĥilono, malkonsilis ĝin riski. La fajro, vere, ne ekposedis ĝis nun tiun parton de la urbo, sed ĉiuj placoj kaj stratoj povis esti tute ŝtopitaj de homoj kaj iliaj havaĵoj. Ĥilono konsilis iri tra la Kampo Vatikana<sup>282</sup> ĝis la pordego Flaminia, tie transriveriĝi kaj paŝi pluen ekster la muroj, post la ĝardenoj Aciliaj<sup>283</sup>, al la Sala pordego. Viniĉio, post momenta hezitado, konsentis tiun konsilon.

Makreno devis gardoresti hejme, sed li provizis du mulojn, kiuj povis servi ankaŭ por la plua vojiro por Liguria. Li volis ankaŭ doni sklavon, sed Vinicio rifuzis, supozante, ke kiel jam okazis antaŭe, iu ajn taĉmento da pretorianoj, renkontita envoje, subiĝos al lia komando.

Kaj post momento li ekiris kun Ĥilono tra la Kampo Janikula al la Triumfa vojo. En liberaj lokoj tie kaj ie estis tendaroj, ili tamen trapuŝadis sin kun malpli granda peno, ĉar pliparto de la loĝantoj forkuris al la maro laŭ la Havena vojo. Post la pordego Septima<sup>284</sup> ili rajdis inter la rivero kaj la grandiozaj ĝardenoj de Domicia, kies potencaj cipresoj ruĝe brilis de la brulo, kvazaŭ de subiranta suno.

<sup>282</sup> Monteta tereno (lat. *Ager Vaticanus*) kun la Vatikana Cirko; nun tie situas la baziliko de s-ta Petro.

<sup>283</sup> Fakte la tieaj «Ĝardenoj de la Acilioj» (lat. *Horti Aciliorum*) aperis en la 2<sup>a</sup> jc p.K.

<sup>284</sup> Kiel indikas ĝia nomo, la pordego *Septimiana* estis konstruita sub Septimo Severo (la jaroj 146–211).



La vojo iĝadis pli libera, nur iafoje ili devis batali kun torrentoj da alfluantaj kamparanoj. Vinicio pelis la mulon, kiom li povis, kaj Ĥilono, rajdante tuj post li, parolis dum la tuta vojo kun si mem:

«Jen la brulo restis post ni kaj nun ĝi varmigas niajn dorsojn. Ankoraŭ neniam sur tiu vojo estis tiel lume en nokto. Ho Zeŭso! Se ci ne faligos pluvegon sur tiun brulon, ĝi pruvos, ke ci ne amas Romon. La homa povo ne estingos tiun fajron. Tia urbo, al kiu servis Grekujo kaj la tuta mondo! Kaj nun iu ajn greko povos rosti siajn fabojn en ĝiaj cindroj! Kiu ĝin supozus!... Kaj ne estos plu Romo, nek la romaj sinjoroj!... Kaj kiu volos paŝi sur la brulrestaĵoj, kiam ili malvarmiĝos, kaj fajfi, tiu fajfos senpune. Ho dioj, fajfi je tia mondreganta urbo! Kiu el la grekoj, aŭ eĉ el la barbaroj, povus ĝin supozi?... Tamen oni povos fajfi, ĉar amaso da cindroj, ĉu ĝi restas post fajro de paŝtistoj, aŭ post bruligita urbo, estas nur amaso da cindroj, kiujn pli aŭ malpli frue la vento disblovos.»

Tiel parolante, li turnadis sin momente al la brulo kaj rigardis la fajrajn ondojn kun vizaĝo kune malbona kaj ĝoja. Poste li parolis plu:

«Ĝi pereas! Pereas! Kaj ĝi ne estos plu sur la tero. Kien la mondo nun sendados sian grenon, sian olivoleon kaj sian monon? Kiu elpremados el ĝi oron kaj larmojn? Mar-

moro ne forbrulas, sed polviĝas en fajro. Kapitolo falos en rubojn, Palatino falos en rubojn. Ho Zeŭso! Romo estis kiel ŝafisto, kaj la aliaj popoloj — kiel ŝafoj. Kiomfoje la ŝafisto malsatis, li buĉis unu el la ŝafoj, kaj al ci, patro de la dioj, oferis la felon. Kiu buĉados de nun, ho Nuboreganto, kaj en kies manojn ci metos la ŝafistan vipon? Ĉar Romo brulas, patro, tute, kvazaŭ ci mem fajrigus ĝin per tondro.»

— Rapidu! — urĝis Vinicio, — kion ci tie faras?

— Mi priploras Romon, sinjoro, — respondis Ĥilono. — Tia Jova urbo!...

Kaj dum kelka tempo ili rajdis en silento, aŭskultante la krakadon de la brulego kaj bruadon de birdaj flugiloj. Kolomboj, kiuj amase nestis apud la vilaoj kaj urbetoj de Kampanio, kaj kune ĉiaspecaj kampaj birdoj el apud la maro kaj el la proksimaj montaroj, al kiuj la brilo de la brulo ŝajnis videble la taga lumo, grandare blinde flugis en la fajron.

Vinicio la unua interrompis la silenton.

— Kie ci estis, kiam la fajro eksplodis?

— Mi estis iranta, sinjoro, al mia amiko Eŭrikio, kiu havis butikon apud la Granda cirko, kaj mi estis ĝuste meditanta pri la instruo de Kristo, kiam oni komencis krei: «Brulas!» Homoj amasiĝis ĉe la cirko por ĝin savi kaj pro

scivolo, sed kiam la flamoj ekregis la tutan cirkon, kaj krome komencis montri sin samtempe en aliaj lokoj, oni devis pensi pri la propra savo.

— Ĉu ci vidis homojn, ĵetantajn torĉojn en la konstruaĵojn?

— Kion mi ne vidis, nepo de Eneo! Mi vidis homojn, trabatantajn al si per glavo la vojon en la interpremo; mi vidis batalojn kaj homajn internaĵojn, dispremitajn sur la tero. Ha, sinjoro, se ci tion rigardus, ci kredus, ke barbaroj konkeris la urbon kaj buĉas la popolon. La homoj ĉirkaŭe kriis, ke venis fino de la mondo. Kelkaj tute perdis la prudenton kaj, rezigninte la forkuron, atendis senpense, ke ĉirkaŭu ilin la flamoj. Aliaj freneziĝis, aliaj hurlis pro malespero, sed mi vidis ankaŭ tiajn, kiuj hurlis pro ĝojo, ĉar en la mondo, ho sinjoro, estas multaj malbonuloj, kiuj ne scias taksi la bonfarecon de via milda regado kaj tiujn justajn leĝojn, laŭ kiuj vi forprenas de ĉiuj kion ili havas, kaj proprigas ĝin al vi. La homoj ne scias paciĝi kun la volo de la dioj.

Vinicio estis tro absorbita per siaj pensoj por rimarki la ironion, vibrantan en la vortoj de Ĥilono. Tremo de teruro trakuradis lin je la nura penso, ke Ligia povus troviĝi meze de tiu ĥaoso, sur tiuj teruraj stratoj, kie oni dispremadis sur la tero homajn internaĵojn. Do, kvankam pli ol

dek fojojn li jam demandis de Ĥilono ĉion, kion tiu povis scii, li turniĝis al li ankoraŭfoje:

— Ĉu ci ilin vidis en Ostriano per la propraj okuloj?

— Mi vidis, filo de Venero, mi vidis la fraŭlinon, la bonan ligion, la sanktan Linon kaj Petron la apostolon.

— Antaŭ la brulo?

— Antaŭ la brulo, Mitro!

Sed en la animo de Vinicio naskiĝis dubo, ĉu Ĥilono mensogas; do, haltiginte la mulon, li rigardis severe la maljunan grekon kaj demandis:

— Kion ci tie faris?

Ĥilono konfuziĝis. Ŝajnis al li, vere, kiel al multaj homoj, ke kune kun la pereco de Romo venas ankaŭ fino de la Roma regado, sed dume li estis sola kun Vinicio, kaj li memoris, ke la lasta malpermeso al li, minacante teruran punon, spioni la kristanojn, precipe Linon kaj Ligian.

— Sinjoro, — li diris, — kial ci ne kredas al mi, ke mi ilin amas? Jes! Mi estis en Ostriano, ĉar mi estas duone kristano. Pirono instruis min respekti virton pli ol filozofion, do ĉiam pli mi inklinas al virtuloj. Krom tio, sinjoro, mi estas malriĉa, kaj kiam ci, Jovo, estis en Ancio, mi ofte suferis malsaton ĉe miaj libroj, do mi sidiĝadis apud la muro de Ostriano, ĉar la kristanoj, kvankam mem malriĉaj, disdonas pli da almozoj ol ĉiuj aliaj loĝantoj de

Romo kune.

Tiu ĉi motivo ŝajnis al Vinicio sufiĉa, li do demandis malpli severe:

— Kaj ci ne scias, kie por tiu ĉi tempo ekloĝis Lino?

— Ci foje punis min kruele por mia scivolo, sinjoro, — respondis la greko.

Vinicio silentiĝis, kaj ili rajdis pluen.

— Sinjoro, — diris Ĥilono post momento, — ci ne retrovus la fraŭlinon sen mia helpo, sed se ni ŝin retrovos, ĉu ci ne forgesos pri la malriĉa saĝulo?

— Ci ricevos domon kun vinberejo apud Ameriolo, — respondis Vinicio.

— Dankon al ci, Herkulo! Kun vinberejo?... Dankon al ci! Ho jes, kun vinberejo!

Ili pasis nun la altaĵojn de Vatikano, kiuj ruĝe brilis de la brulo, sed post la Naŭmaĥiejo ili direktiĝis dekstren, por, transirinte la Vatikanan kampon, proksimiĝi al la rivero kaj transiĝinte sur la alian bordon, atingi ĝis la pordego Flaminia. Subite Ĥilono haltigis la mulon kaj diris:

— Sinjoro! Bona ideo venis en mian kapon.

— Parolu, — respondis Vinicio.

— Inter Janiculo kaj Vatikano, post la ĝardenoj de Agripino, estas subteraĵoj, el kiuj oni prenadis ŝtonojn kaj sablon por konstrui la cirkon de Nerono. Aŭskultu min,

sinjoro! En la lasta tempo la judoj, kiuj, kiel ci scias, estas multegaj en Transtibero, komencis kruele persekuti la kristanojn. Ci memoras, ke jam en la tempo de la dia Klaŭdio estis inter ili tiaj malpacoj, ke la imperiestro estis devigita ekzili ilin el Romo. Nun, kiam ili revenis kaj kiam, dank' al la protektado de la aŭgustino, ili sentas sin sekuraj, tiom pli malhumile ili traktas la kristanojn. Mi scias tion! Mi ĝin vidis. Neniu edikto kontraŭ la kristanoj estas eldonita, sed la judoj akuzas ilin antaŭ la urboprefekto, ke ili murdas infanojn, adoras azenon, proklamas instruon ne aprobitan de la senato, kaj mem ili atakas la kristanojn kaj invadas iliajn preĝdomojn tiel obstine, ke la kristanoj devas sin kaŝi.

— Kion do ci volas diri? — demandis Vinicio.

— Tion, sinjoro, ke la sinagogoj ekzistas malkaŝe en Transtibero, sed la kristanoj, volante eviti persekutadon, devas preĝi kaŝite kaj ili kunvenas en forlasitaj budoj ekster la urbo, aŭ en sablofosejoj. Tiuj, kiuj loĝas en Transtibero, elektis al si ĝuste tiun sablofosejon, kiun oni estigis por la konstruado de la cirko kaj de multaj domoj laŭlonge de Tibero. Nun, kiam la urbo pereas, sendube la konfesantoj de Kristo preĝas. Ni trovos sennombran amason da ili en la subteraĵo, tial mi konsilas al ci, ke ni ĝin vizitu envoje.

— Ci ja diris, ke Lino iris Ostrianon! — ekkriis malpacience Vinicio.

— Sed ci promesis al mi domon kun vinberejo apud Ameriolo, — respondis Ĥilono, — do mi volas serĉi la fraŭlinon ĉie, kie mi povas esperi ŝin trovi. Post la eksplodo de la brulo ili povis reveni Transtiberon ... Ili povis ĉirkaŭiri la urbon, kiel ni ĝin nun ĉirkaŭiras. Lino havas domon, eble li volis esti pli proksime al la domo por vidi, ĉu la brulo ne ekregos ankaŭ tiun kvartalon. Se ili revenis, tiam mi ĵuras al ci, sinjoro, je Persefono, ke ni trovos ilin preĝantaj en la subteraĵo, kaj en malplej bona okazo ni ricevos informojn pri ili.

— Ci pravas, sekve konduku! — diris la tribunuso.

Ĥilono sen momenta pripenso direktiĝis maldekstren, al monteto. Por momento la deklivo de tiu monteto kovris de ili la brulon, tiel ke kvankam la apudaj altaĵoj estis en lumo, ili mem troviĝis en ombro. Pasinte preter la cirko, ili direktiĝis ankoraŭfoje maldekstren kaj eniris specon de intermontaĵo, en kiu estis tute mallume. Sed en tiu mallumo Vinicio distingis amasojn da flagrantaj lanternoj.

— Jen ili! — diris Ĥilono. — Ili estos hodiaŭ pli multaj ol ordinare, ĉar aliaj preĝodomoj forbrulis aŭ estas plenaj je fumo, kiel la tuta Transtibero.

— Jes! Mi aŭdas kantadon, — respondis Vinicio.

Efektive, el malluma malfermaĵo supre aŭdiĝadis kantantaj homaj voĉoj, kaj la lanternoj malaperadis en ĝi unu post la alia. Sed ankaŭ el flankaj intermontaĵoj elŝovadis sin ĉiam novaj figuroj, tiel ke post kelka tempo Vinicio kaj Ĥilono troviĝis meze de tuta aro da homoj.

Ĥilono deiris de la mulo kaj, farinte signon al knabo, kiu iris apude, diris al li:

— Mi estas pastro de Kristo kaj episkopo. Tenu niajn mulojn, kaj ci ricevos mian benon kaj pardonon por la pekoj.

Poste, ne atendente respondon, li enmetis la kondukilojn en lian manon, kaj mem aliĝis kun Vinicio al la iranta aro.

Post momento ili malsupreniris en la subteraĵon kaj paŝis antaŭen ĉe malklara brilo de la lanternoj laŭlonge de malluma koridoro, ĝis ili atingis vastan kavernon, el kiu videble oni antaŭe prenadis ŝtonojn, ĉar la muroj estis formitaj el iliaj freŝaj rompaĵoj.

Estis tie pli lume ol en la koridoro, ĉar krom meĉlampoj kaj lanternoj brulis torĉoj. Ĉe ilia lumo Vinicio ekvidis tutan amason da homoj, genuantaj kun suprenetenditaj brakoj. Ligian, Petron la apostolon aŭ Linon li povis nenie rimarki, anstataŭe ĉirkaŭis lin ĉiuflanke vizaĝoj solenaj kaj emociitaj. En kelkaj videbla estis atendo, timo, espero.



La lumo rebrilis sur la suprenlevitaj okulblankoj, ŝvito gutis de la fruntoj, palaj, kiel kreto; kelkaj kantis kantojn, aliaj febre ripetadis la nomon de Jesuo, kelkaj batis siajn brustojn. En ĉiuj oni vidis, ke ili atendas ĉiumomente ion eksterordinaran.

Subite la kantoj eksilentis kaj super la kunvenintoj, en niĉo, formita pro elpreno de grandega rokpeco, montriĝis Krispo, konata al Vinicio, kun vizaĝo kvazaŭ duonkonscia, pala, fanatika kaj severa. La okuloj sin turnis al li, kvazaŭ atendente vortojn de kuraĝigo — kaj li, beninte per krucosigno la kunvenintojn, parolis per voĉo rapida kaj preskaŭ simila al krio:

— Pentu pro viaj pekoj, ĉar la momento alvenis. Jen sur la urbon de krimo kaj malvirto, jen sur la novan Babilonon la Sinjoro pluvigis pereigan flamon. Ekbatis la horo de l' juĝo, kolero kaj pereo ... La Sinjoro antaŭdiris Sian alvenon, kaj baldaŭ vi lin ekvidos! Sed li venos jam ne kiel Ŝafido, kiu oferis Sian sangon pro viaj pekoj, sed kiel severega juĝisto, kiu en Sia justeco profundigos en abismon la pekulojn kaj nekredantojn ... Ve al la mondo kaj ve al la pekuloj, ĉar ne estos plu kompatato por ili!... Mi vidas cin, Kristo! La steloj pluve falas sur la teron! La suno mal lumiĝas, la tero malfermiĝas en abismojn, mortintoj leviĝas, kaj ci venas meze de sonoj de trumpetoj, meze de taĉ-

mentoj da anĝeloj, meze de tondroj kaj uraganoj. Mi vidas cin, ho Kristo!

Ĉe tiuj vortoj li eksilentis kaj, levinte la vizaĝon, ŝajnis fiksi la rigardon sur io malproksima kaj terura. Kaj subite en la subteraĵo aŭdiĝis obtuza tondro, unu, dua ... deka; en la flamanta urbo tutaj stratoj de brulkonsumitaj domoj komencis falegi teren kun grandega bruo. Sed al la plimulto de la kristanoj tiuj sonoj ekŝajnis klara signo, ke la terura horo alvenas, ĉar la kredo pri la baldaŭ okazonta dua veno de Kristo kaj pri la fino de la mondo estis inter ili eĉ antaŭe ĝenerala, kaj nun plifortigis ĝin ankoraŭ la brulego de la urbo. Tial la timo de Dio ekregis la kunvenintojn. Multaj voĉoj komencis ripeti: «La tago de la juĝo ... Jen ĝi venas!» Kelkaj kovris la vizaĝojn per la manoj, konvinkite, ke tuj la tero ekstremos sur siaj fundamentoj kaj el ĝiaj abismoj eliros inferaj monstroj por ĵeti sin sur la pekulojn. Aliaj vokis: «Kristo, kompatu! Savinto, estu kompatema!»... aliaj laŭte konfesadis siajn pekojn, aliaj fine ĵetadis sin reciproke en la brakojn por havi apud si iujn amikajn korojn en la terura momento.

Sed estis ankaŭ tiaj homoj, kies vizaĝoj, kvazaŭ tiuj de ĉielprenitoj, plenaj je superteraj ridetoj, ne elmontris timon. En kelkaj lokoj aŭdiĝis kantotonoj: en la religia ekstazo homoj komencis krei nekompreneblajn vortojn en ne-

kompreneblaj lingvoj. Iu el malluma angulo de la kaverno vokis: «Vekiĝu, kiu dormas!» Ĉion tamen superbruis la krio de Krispo: «Estu pretaj! Estu pretaj!»

Iafoje tamen ekregadis silento, kvazaŭ ĉiuj, retenante la spiron en la brustoj, atendus tion, kio okazos. Kaj tiam oni aŭdis malproksimajn tondrojn de kvartaloj, falantaj en rubojn, post kio denove eksonadis ĝemoj, preĝoj, kantotonoj kaj voĉoj: «Savinto, kompatu nin!» Iafoje Krispo ekparoladis kaj kriis: «Rezignu la terajn riĉaĵojn, ĉar baldaŭ vi ne havos plu la teron sub la piedoj! Rezignu la terajn sentojn, ĉar la Sinjoro pereigos tiujn, kiuj pli ol lin amis siajn edzinojn kaj infanojn. Ve al tiu, kiu ligis sian koron pli al kreito ol al la Kreinto! Ve al potenculoj! Ve al luksamantoj! Ve al malvirtuloj! Ve al viro, virino kaj infano!»

Subite bruego pli forta ol la antaŭaj, ekskuis la ŝtonminejon. Ĉiuj falis teren, etendante la brakojn krucforme por per tiu signo defendi sin kontraŭ malbonaj spiritoj. Sekvis silento, en kiu oni aŭdis nur rapidajn spirojn, plenajn je teruro flustroj: «Jesuo, Jesuo, Jesuo!» kaj ialoke ploron de infanoj. Subite super tiu nigra, kuŝanta homamaso iu trankvila voĉo diris:

— Pacon al vi!

Ĝi estis la voĉo de Petro la apostolo, kiu antaŭ mo-

mento eniris la kavernon. Pro la sono de liaj vortoj la teruro pasis en unu momento, kiel pasas teruro de ŝafaro, meze de kiu aperis la ŝafisto. La homoj leviĝis de la tero, la pli proksimaj komencis premi sin al liaj genuoj, kvazaŭ serĉante defendon sub liaj flugiloj; Petro etendis super ili la manojn kaj diris:

— Kial vi timas en viaj koroj? Kiu el vi antaŭscias, kio povas lin trafi, antaŭ ol la horo alvenos? La Sinjoro punis per fajro Babilonon, sed al vi, kiujn lavis bapto kaj kies pekojn pardonigis la sango de la Ŝafido, elmontrita estos lia kompatato kaj vi mortos kun lia nomo en viaj buŝoj. Pacon al vi!

Post la severaj kaj senkompataj vortoj de Krispo la vortoj de Petro venis, kiel balzamo al la ĉeestantoj. Anstataŭ la timo de Dio ekregis ilin amo al Dio. Tiuj homoj retrovis tian Kriston, kian ili amis el la rakontoj de Petro — ne senkompatan juĝiston, sed dolĉan kaj paciencon Ŝafidon, kies kompatemo centoble superis la homan malbonecon. La sento de konsolo ekregis la tutan amason kaj kuraĝo kune kun dankemo al la apostolo plenigis iliajn korojn. Voĉoj el diversaj flankoj komencis voki: «Ni estas tiaj ŝafoj, paŝtu nin.» La pli proksimaj parolis: «Ne forlasu nin en la tago de pereco!» Kaj ili genuiĝadis ĉe liaj genuoj, kion vidante, Vinicio proksimiĝis, kaptis la randon

de lia mantelo kaj, klininte la kapon, diris:

— Sinjoro, helpu min! Mi serĉis ŝin en la fumoj de la brulego kaj en la homa interpreto, kaj nenie mi povis ŝin trovi, sed mi kredas, ke ci povas redoni ŝin al mi.

Petro metis la manon sur lian kapon.

— Fidu, — li diris, — kaj sekvu min.

## Ĉapitro 46<sup>a</sup>

La urbo brulis senĉese. La Granda cirko falis en rubojn, kaj poste en la kvartaloj, kiuj unuaj komencis bruli, falegadis tutaj stratoj kaj stratetoj. Post ĉiu tia falo fajraj kolonoj leviĝadis momente ĝis la ĉielo. La vento ŝanĝiĝis kaj blovis nun kun grandega forto flanke de la maro, portante al Celio, al Eskvilino kaj Viminalo ondojn da fajro, brulaĵoj kaj karbopecoj. Oni jam tamen komencis pensi pri savo. Laŭ la ordono de Tigeleno, kiu en la tria tago alkuris el Ancio, oni komencis detruigi la domojn sur Eskvilino, por ke la fajro, renkontinte malplenajn lokojn, mem estingiĝu. Ĝi estis tamen vana helpo, entreprenita por savi la ceteron de la urbo, ĉar pri savo de tio, kio jam estis brulanta, oni eĉ ne povis pensi. Oni decidis ankaŭ antaŭgardi kontraŭ pluaj sekvoj de la katastrofo. Kune kun Romo pereis ĝiaj senlimaj riĉaĵoj, pereis la tuta havaĵo de la civitanoj, tiel ke ĉirkaŭ la muroj tendovagis nun centmiloj

da kompletaj mizeruloj. Jam en la dua tago malsato sentigis sin al tiu homamaso, ĉar la grandegaj provizoj da nutraĵo, kolektitaj en la urbo, brulis kune kun ĝi, kaj en la ĝenerala ĥaoso kaj malordigo de la oficoj neniu ekpensis ĝis nun pri venigo de novaj provizoj. Nur post la alveno de Tigeleno oni sendis en Ostion la konformajn ordonojn, sed dume la popolo komencis alpreni ĉiam pli minacan sintenon.

La domon apud la akvedukto Appia, en kiu dume loĝis Tigeleno, ĉirkaŭadis amasoj da virinoj, kriantaj de mateneno ĝis malfrua nokto: «Panon kaj tegmenton!» Vane la pretorianoj, venigitaj el la granda tendaro staranta inter la vojoj Sala kaj Nomentana, penis gardi ian ordonon. Tie kaj ie oni ilin malkaŝe kontraŭstaris armite, aliloke senarmaj homaj aroj, montrante la brulantan urbon vokis: «Murdu nin kontraŭ tiu fajro!» Oni minacis al la imperiestro, al la aŭgustanoj, al la pretoriaj soldatoj, kaj la ekscito kreskis kun ĉiu horo tiel, ke Tigeleno, rigardante nokte la milojn da fajroj, dismetitaj ĉirkaŭ la urbo, parolis al si mem, ke tio estas fajroj de malamika tendaro. Laŭ lia ordono oni venigis, krom faruno, laŭeble grandan nombron da pretaj panbuloj, kiujn oni kolektis ne nur el Ostio, sed el ĉiuj proksimaj urboj kaj vilaĝoj. Apenaŭ tamen la unuaj sendaĵoj venis nokte en Emporion, la popolo elrom-

pis la pordegon flanke de Aventino kaj disrabis en unu sekundo la provizojn, kaŭzante teruran konfuzon. Ĉe la brilo de la brulruĝo oni batalis pro panbuloj, da kiuj amason oni piedpremis en la teron. La faruno el la disŝiritaj sako kovris kvazaŭ per neĝo la tutan spacon, de la grenejoj ĝis la Arko de Druzo kaj Germaniko, kaj la tumulto daŭris, ĝis soldatoj posteniĝis ĉe ĉiuj konstruaĵoj kaj komencis forpeli la amasojn per sagoj kaj ĵetaĵoj.

Neniam, de la gaŭla invado en la tempo de Brenno, trafis Romon simila batego. Oni ankaŭ komparadis kun malespero tiujn ambaŭ brulojn. Sed tiam restis almenaŭ Kapitolo. Nun ankaŭ Kapitolon ĉirkaŭis terura fajrokrono. La marmoroj ne flamis, vere, sed en nokto, kiam vento disŝovadis por momento la flamojn, oni vidis vicojn de la kolonoj de la supera templo de Jovo, ardantaj kaj brilantaj rozkoloro, kvazaŭ ardantaj karboj. Fine, en la tempo de Brenno Romo havis popolon disciplineman, unugentan, amantan la urbon kaj la altarojn, dum nun ĉirkaŭ la muroj de la brulanta Romo tendovagis amasoj diverslingvaj, konsistantaj plejparte el sklavoj kaj liberigitoj, ribelemaj, senbridaj kaj pretaj sub la premo de mizero turni sin kontraŭ la aŭtoritatulojn kaj kontraŭ la urbon.

Sed la amplekso mem de la brulego, pleniganta la korvojn per teruro, paralizis certgrade la amason. La plagon

de fajro estis sekvonta la plago de malsato kaj de malsanoj, ĉar, je pli granda malfeliĉo, venis terura julia varmego. La aeron, brulantan de la fajro kaj suno, oni ne povis spiri. La noktoj ne nur ne malpliigadis la varmegon, sed iĝadis simple inferaj. Tage terura kaj korporema vidaĵo prezentis sin al la okuloj. En la mezo — la grandega urbo sur la montetoj, ŝanĝita en unu bruegantan vulkanon, kaj ĉirkaŭe, ĝis la Albana montaro — unu senlima tendaro, konsistanta el tendoj, budoj, branĉaĵoj, veturiloj, puŝĉaroj, portiloj, butikoj, fajroj, ĉio vualita de fumo, polvo, lumigita de rustaj radioj de la suno pasanta tra la brulo, plena je bruo, krioj, minacoj, malamo kaj timo, terura bildo de virtoj, virinoj kaj infanoj. Meze de la *kviritoj* — grekoj, vilaj unuokululoj el la nordo, afrikanoj kaj azianoj; meze de la civitanoj — sklavoĵoj, liberigitoj, gladiatoroj, komercistoj, metiistoj, kamparanoj kaj soldatoj; vera homa maro ĉirkaŭlavanta fajran insulon.

Diversaj famoj movis tiun maron, kiel vento movas verajn ondojn. Ili estis favoraj kaj malfavoraj. Oni rakontis pri senmezuraj provizoj da greno kaj da vestoj, kiuj estis venontaj en Emporion kaj senpage disdonotaj. Oni diradis ankaŭ, ke laŭ la ordono de la imperiestro ĉiuj provincoj en Azio kaj Afriko estos senhavigitaj de siaj riĉaĵoj, kaj la trezorojn, tiamaniere kolektitajn, oni disdonos inter



la loĝantojn de Romo, por ke ĉiu povu konstrui al si propran domon. Sed samtempe oni diskonigadis ankaŭ tiajn novaĵojn, ke la akvo en la akveduktoj estas venenita kaj ke Nerono volas detrui la urbon kaj ekstermi ĉiujn loĝantojn senescepte por translokiĝi en Grekujon aŭ Egiptujon kaj de tie regi la mondon. Ĉiu famo disvastiĝadis fulmrapide, kaj ĉiu el ili trovadis kredon ĉe la amaso, kaŭzante eksplodojn ĉu de espero, kolero, teruro, aŭ de furiozo. Fine ia febro ekregis tiujn milojn da vaguloj. La kredo de la kristanoj, ke la fino de la mondo pro fajro estas proksima, vastiĝadis ankaŭ inter la konfesantoj de la dioj, ĉiutage pli ĝenerale. La homojn ekreregadis konsterno aŭ furiozo. Meze de nuboj, lumigitaj de la brulbrilo, oni vidis la diojn, rigardantajn la pereon de la tero, kaj oni etendadis al ili la brakojn, petante kompaton, aŭ malbenis ilin.

Dume soldatoj, helpate de certa nombro da loĝantoj, detruadis senĉese la domojn sur Eskvilino, sur Celio kaj en Transtibero, kiu dank' al tio grandparte evitis la pereon. Sed en la urbo mem brulis sennombraj trezoroj, amasigitaj dum jarcentoj da venkoj, netakseblaj artverkoj, grandiozaj temploj kaj plej karaj monumentoj de la Roma pasinteco kaj de la Roma gloro.

Oni antaŭvidis, ke el la tuta urbo estos savitaj apenaŭ kelkaj ekstremaj kvartaloj kaj ke centmiloj da homoj rest-

os sen tegmento super la kapo. Aliaj tamen disvastigadis la famon, ke la soldatoj detruas la domojn ne por haltigi la fajron, sed por ke nenio restu el la urbo. Tigeleno en ĉiu letero petegis, ke la imperiestro alvenu kaj per sia ĉeesto trankviligu la malesperantan popolon. Sed Nerono moviĝis nur tiam, kiam la flamoj ekposedis la *Domus transitoria*, kaj li rapidis por ne preterlasi la momenton, en kiu la brulego atingos sian plej grandan potencon.

## Ĉapitro 47<sup>a</sup>

La fajro atingis dume ĝis la Vojo Nomentana, kaj de ĝi, kun aliĝo de la vento, sin turnis al la Vojo Larĝa kaj al Tibero, ĉirkaŭiris Kapitolon, disverŝis sin tra la Bova Forumo kaj detruante ĉion, kion ĝi preterlasis en la unua impeto, proksimiĝis denove al Palatino. Tigeleno, kolektinte ĉiujn pretoriajn fortojn, sendis kurieron post kuriero al la proksimiĝanta imperiestro, ke li nenion perdos el la grandiozeco de la spektaklo, ĉar la brulo eĉ plikreskis.

Sed Nerono volis alveni nokte, por tiom pli ĝui la bildon de la pereanta urbo. Tiucele li haltis en la regiono de la Lago Albana kaj, vokinte en sian tendon la tragediiston Alituron, li preparis kun lia helpo la sintenon, vizaĝon, rigardon kaj lernis konvenajn gestojn, varme diskutante kun li, ĉu ĉe la vortoj: «ho sankta urbo, ci, kiu ŝajnis pli

daŭra ol Ido<sup>285</sup>», li levu supren ambaŭ manojn, aŭ, tenante en unu formingon, lasu ĝin fali laŭlonge de la korpo, kaj levu nur la alian. Kaj tiu demando ŝajnis al li ĉi-momente pli grava ol ĉiuj aliaj.

Ekirinte fine je la krepusko, li interkonsilis ankoraŭ kun Petronio, ĉu en la versojn, dediĉitajn al la katastrofo, li enmetu kelkajn brilajn blasfemojn kontraŭ la dioj, kaj ĉu tiaj vortoj, konsiderate el la arta vidpunkto, devus mem elŝiri sin en simila situacio el la buŝo de homo, perdanta la patrujon.

Ĉirkaŭ la noktomezo li proksimiĝis fine al la muroj, kune kun sia kortego, konsistanta el taĉmentoj da korteganoj, senatanoj, kavaliroj, liberigitoj, sklavoĵ, virinoj kaj infanoj. Dek ses mil pretorianoj, starigitaj batalorde laŭlonge de la vojo, gardis la trankvilecon kaj sekurecon de lia enveturo, tenante kune je certa distanco la ekscititan popolon. La popolo insultis, vere, kriis kaj fajfis ĉe la vido de la imperiestra anaro, sed ne kuraĝis ĝin ataki. En multaj lokoj aŭdiĝis tamen eĉ aplaŭdoj de ĉifonuloj, kiuj, nenion posedinte, nenion perdis en la brulo, kaj esperis pli malavaran ol ordinare disdonadon de greno, olivoleo, ves-

<sup>285</sup> Ido (gr. Ἴδῶ /idē/, lat. Ida) — greka nomo de du montoj en la antikva Helenujo: la unu en Frigio, kaj la alia en Kreto. En la grekaj mitoj tiu nomo rilatas al montoj dediĉitaj al la pramalnova Patrindiino (la Granda Diino), kies kulto venas el la epoko antaŭgreka.

toj kaj mono. Fine same la kriojn kaj fajfojn, kiel la aplaŭdojn, superbruis la sono de trumpetoj kaj kornoj, kiujn oni ekblovis laŭ la ordono de Tigeleno.

Pasinte la Ostian pordegon, Nerono haltis momente kaj diris:

— Senhejma reĝo de l' senhejma gento, kien mi metu nokte mian kapon!

Poste, pasinte tra la Deklivo Delfina, li surpaŝis per pretigita por li ŝtuparo la Appian akvedukton, sekvate de aŭgustanoj kaj ĥoro de kantistoj, portantaj citrojn, liutojn kaj aliajn muzikajn instrumentojn.

Kaj ĉiuj retenis la spiron en la brustoj, atendente, ĉu li eldiros iajn grandajn vortojn, kiujn por la propra sekureco oni devus memori. Sed li staris solena, silenta, vestita per purpura mantelo kaj per krono el oraj laŭroj, rigardante la furiozan potencon de la flamoj. Kiam Terpno donis al li oran liuton, li levis la okulojn al la brulruĝa ĉielo, kvazaŭ atendente inspiron.

La popolo de malproksime montris lin per la manoj, surverŝitan de sanga brilo. For en la urbo siblis fajraj serpentoj kaj brulis la antikvaj, plej karaj memoraĵoj: brulis la templo de Herkulo, kiun konstruis Evandro, kaj la templo de Jovo Satoro, kaj la templo de Luno, konstruita ankoraŭ de Servio Tulio, kaj la domo de Numo Pompilio, kaj

la sanktejo de Vesto kun la penatoj de la Roma popolo, meze de fajraj langoj montriĝadis iafoje Kapitulo, brulis la pasinteco kaj la animo de Romo, kaj li, imperiestro, staris kun liuto en la mano, kun vizaĝo de tragedia aktoro kaj kun penso ne pri la pereanta patrujo, sed pri sinteno kaj vortoj, per kiuj li povus esprimi plej bone la grandecon de la katastrofo, veki plej grandan admiron kaj akiri plej varmajn aplaŭdojn.

Li malamis tiun ĉi urbon, li malamis ĝiajn loĝantojn, li amis sole la proprajn kantojn kaj versaĵojn, do li ĝojis en la koro, ke fine li vidas tragedion, similan al tiu, kiun li priskribis. La versfaristo sentis sin feliĉa, la deklamisto sentis sin inspirita, la serĉisto de emocioj ĝuis la teruran spektaklon kaj kun senlima plezuro pensis, ke eĉ la detruo de Trojo estis nenio kompare kun la detruo de tiu ĉi grandega urbo. Kion pli li povus deziri? Jen Romo, la mondpotenca Romo, brulas, kaj li staras sur akvedukta arkaĵo, kun ora liuto en la mano, luma, purpura, admirata, grandioza kaj poezia. Ie for, malsupre, en la ombro, murmuris kaj tumultas la popolo. Sed ĝi murmuru. Jarcentoj pasos, jarmiloj fluos for, kaj la homoj memoros kaj gloros la poeton, kiu en tia nokto kantis la pereon kaj brulon de Trojo. Kio kontraŭ li estas Homero? Kio estas Apolono mem kun sia simpla formingo?

Li levis la manojn supren kaj ekbatinte la kordojn, ek-kantis la vortojn de Priamo:

*Nesto de miaj patroj, ho lulilo kara!...*

En la libera aero, ĉe la bruo de la brulo kaj ĉe la malproksima murmuro de milhomaj amasoj lia voĉo ŝajnis strange pala, tremanta, malforta, kaj la akompano de la ĥoro sonis kiel zumado de muŝo. Tamen la senatanoj, oficistoj kaj aŭgustanoj, ariĝintaj sur la akvedukto, klinis la kapojn, aŭskultante en silenta admiro Kaj li kantis longe kaj agordis sin ĉiam pli funebre. En la momentoj, kiam li ĉesadis por kapti la spiron, la ĥoro ripetadis la lastajn versojn, post kio denove, per gesto lernita de Alituro, Nerono deĵetadis de la ŝultro sian tragedian *sirmon*,<sup>286</sup> frapadis la kordojn kaj kantis plu. Fininte la antaŭe komponitan kanton, li komencis improvizi, serĉante grandajn komparojn en la spektaklo, kiu etendis sin antaŭ li. Kaj lia vizaĝo komencis iĝi jen pala, jen ruĝa. Ne tuŝis lin la pereo de la patrourbo, sed li ekstaziĝis kaj emociiĝis pro la patoso de la propraj vortoj tiagrade, ke li subite faligis kun tinto la liuton al la piedoj kaj, ĉirkaŭvolvinte sin per la *sirmo*, restis kvazaŭ ŝtoniĝinta, simila al unu el tiuj statuoj de Niobidoj, kiuj ornamis la korton de Palatino.

Post mallonga momento da silento ektondris uragano

<sup>286</sup> Lat. *syрма* — vesto kun longa trenajo, kian uzis i.a. aktoroj-tragediistoj.

da aplaŭdoj. Sed de malproksime respondis al ĝi muĝado de la amaso. Nun neniu jam dubis, ke Nerono mem ordonis bruligi la urbon por fari al si spektaklon kaj kanti ĉe ĝi kantojn. Nerono, ekaŭdinte tiun krion de centmiloj da voĉoj, sin turnis al la aŭgustanoj kun malgaja, rezignoplena rideto de homo, al kiu oni faras maljustaĵon, kaj diris:

— Jen, kiel la *kviritoj* scias taksi min kaj poezion.

— Kanajloj! — respondis Vatinio, — ordonu al la pretorianoj ataki ilin, sinjoro.

Nerono sin turnis al Tigeleno.

— Ĉu mi povas fidi la fidelecon de la soldatoj?

— Jes, dia! — respondis la prefekto.

Sed Petronio movis la ŝultrojn.

— Ilian fidelecon, sed ne ilian nombron, — li diris. — Restu dume, kie ci estas, ĉar tie ĉi estas plej sendanĝere, kaj la popolon oni devas kvietigi.

La samon opiniis ankaŭ Seneko kaj Licinio la konsulo. Dume malsupre la ekscito kreskis. La popolo armis sin per ŝtonoj, per tendaj stangoj, per tabuloj el veturiloj kaj puŝĉaroj kaj per diversaj feraĵoj. Post ioma tempo kelkaj kohortestroj venis kun la sciigo, ke la pretorianoj, premataj de la amasoj, kun plej granda peno konservas la batalordon kaj, ne havante ordonon ataki, ne scias, kion fari.

— Dioj! — diris Nerono, — kia nokto! Unuflanke la

brulo, aliflanke la ondeganta maro de l' popolo.

Kaj li komencis serĉi pliajn esprimojn, kiuj povus bildi la danĝerecon de la momento, sed vidante ĉirkaŭe palajn vizaĝojn kaj maltrankvilajn rigardojn, ankaŭ li ektimis.

— Donu al mi malhelan mantelon kun kapuĉo! — li ekkriis. — Ĉu ci kredas, ke vere okazos batalo?

— Sinjoro, — respondis Tigeleno per necerta voĉo, — mi faris ĉion, kion mi povis, sed la danĝero estas grava ... Ekparolu, sinjoro, al la popolo kaj faru al ĝi promesojn.

— Cezaro parolu al la popolaĉo? Faru ĝin iu alia en mia nomo. Kiu akceptos tiun ĉi taskon?

— Mi! — respondis trankvile Petronio.

— Iru, amiko! Ci estas al mi plej fidela en ĉiu malfacilaĵo ... Iru kaj ne avaru promesojn.

Petronio sin turnis al la imperiestra sekvantaro kun vizaĝo senzorga kaj moka.

— Ĉeestantaj senatanoj, — li diris, — krom ili Pizono, Nervo kaj Seneciono — sekvu min.

Poste li deiris malrapide de la akvedukto, kaj tiuj, kiujn li kunvokis, sekvis lin ne sen hezito, sed kun iom pli granda kuraĝo, kiun inspiris al ili lia trankvileco. Petronio, veninte malsupren de la akvedukto, ordonis doni al si blankan ĉevalon kaj surseliĝinte, ekrajdis fronte de la akompanantoj, inter la profundaj pretorianaj vicoj, al la



nigra, muĝanta popolamaso, senarma, havante en la mano nur maldikan eburan bastonon, kiun li uzis ordinarie por sin apogi.

Kaj alveninte proksimen, li enpuŝis la ĉevalon en la amason. Ĉirkaŭe, ĉe la lumo de la brulo, oni vidis levitajn brakojn, armitajn per ĉiaspecaj armiloj, fajrantajn okulojn, ŝvitantajn vizaĝojn kaj muĝantajn, ŝaŭmkovritajn buŝojn. Furioza ondo tuj ĉirkaŭverŝis lin kaj lian sekvantaron, post ĝi oni vidis efektive kvazaŭ maron de kapoj, moviĝantan, bolantan, teruran.

La krioj kreskis ankoraŭ kaj ŝanĝis sin en nehoman muĝon; stangoj, forkegoj, eĉ glavoj balancis sin super la kapo de Petronio, rabemaj manoj etendis sin al la brido de lia ĉevalo kaj al li, sed li rajdis ĉiam pli profunden, malvarma, indiferenta, malestima. Iafoje li frapis per la bastono la kapojn de la plej atakemaj, tute kvazaŭ li estus trabatanta al si la vojon en ordinara interpremo, kaj tiu lia certeco, tiu trankvileco mirigis tamen la furiozan popolaĉon. Oni rekonis lin fine kaj multaj voĉoj komencis krei:

— Petronio! *Arbiter elegantiarum!* Petronio!

— Petronio! — eksonis de ĉiuj flankoj.

Kaj laŭgrade kiel oni ripetadis lian nomon, la vizaĝoj ĉirkaŭe iĝadis malpli minacaj kaj la krioj malpli furiozaj, ĉar tiu eleganta patricio, kvankam li neniam klopodis pri

favoro de la popolo, estis tamen ĝia favorato. Oni lin opiniis homo humana kaj malavara, kaj lia populareco kreskis precipe de la afero de Pedanio Sekundo, en kiu li pledis por moderigo de la kruela verdikto, kondamnanta je morto ĉiujn sklavojn de la prefekto. Precipe la sklavamasoj amis lin de tiam per tia senmodera amo, kian malfeliĉuloj kaj premitoj kutime sentas al tiuj, kiuj elmontras al ili almenaŭ iomete da kompatato. Krom tio en la nuna momento aliĝis al tio ankaŭ scivolo, kion diros la delegito de la imperiestro, ĉar neniu dubis, ke la imperiestro speciale lin delegis.

Kaj li, depreninte sian blankan, purpure borderitan togon, levis ĝin supren kaj komencis swingi ĝin super la kapo, signe, ke li volas paroli.

— Silentu! Silentu! — oni kriis de ĉiuj flankoj.

Post momento oni eksilentis efektive. Tiam li rektiĝis sur la ĉevalo kaj komencis paroli per laŭta, trankvila voĉo:

— Civitanoj! Tiuj, kiuj min aŭdos, ripetu miajn vortojn al tiuj, kiuj staras malpli proksime, kaj ĉiuj kondutu kiel homoj, ne kiel bestoj sur arenoj.

— Ni aŭskultas! Ni aŭskultas!

— Aŭskultu do. La urbo estos rekonstruita. La ĝardenoj de Lukulo, de Mecenaso<sup>287</sup>, de Agripino kaj de la impe-

riestro estos al vi malfermitaj! Morgaŭ oni komencos disdonadon de greno, vino kaj olivoleo, tiel ke ĉiu povu plenigi la ventron ĝis la gorgo! Poste la imperiestro aranĝos por vi cirkoludojn, kiajn la mondo ĝis nun ne vidis, ĉe kiuj atendos vin festenoj kaj donacoj. Vi estos pli riĉaj post la brulo ol antaŭ la brulo!

Respondis al li murmuro, kiu tiel disiradis de la mezo en ĉiujn direktojn, kiel ondoj disiras sur akvo, en kiun oni ĵetis ŝtonon; la homoj, kiuj staris pli proksime, ripetadis liajn vortojn al la pli malproksimaj. Poste tie kaj ie aŭdiĝis ekkrioj koleraj aŭ konsentaj, kiuj ŝanĝis sin fine en unu ĝeneralan, grandan kriegon:

— *Panem et circenses!!!*<sup>288</sup>

Petronio ĉirkaŭvolvis sin per la togo kaj dum kelka tempo aŭskultis senmove, simila en sia blanka vesto al marmora statuo. La kriego kreskis, superbruis la krakojn de la brulo, sonis de ĉiuj flankoj kaj el ĉiam pli profunde, sed la delegito videble volis ankoraŭ ion diri, ĉar li atendis.

Kaj fine, denove ordoninte per levita mano silenton, li elkriis:

— Mi promesas al vi *panem et circenses*; dume vivuu la

<sup>287</sup> «**Mecenaso**. (hist.) Amiko de Aŭgusto, protektanto de Horacio kaj Vergilio» [NPIV] (lat. *Mæcenas*)

<sup>288</sup> Panon kaj cirkaĵojn! (lat.)

imperiestron, kiu vin nutras kaj vestas, poste iru dormi, aĉularo, ĉar baldaŭ krepuskiĝos la mateno.

Dirinte tion, li turnis la ĉevalon malantaŭen kaj, facile frapante per la bastono la kapojn de tiuj, kiuj baris al li la vojon, forrajdis malrapide al la pretorianaj vicoj.

Post momento li estis apud la akvedukto. Supre li renkontis preskaŭ panikon. Oni ne komprenis tie la ekkrion: *panem et circenses*, kaj kredis, ke ĝi estas nova eksplodo de furiozo. Oni eĉ ne supozis, ke Petronio saviĝos, tial Nerono, ekvidinte lin, alkuris preskaŭ ĝis la ŝtuparo kaj kun vizaĝo, pala de emocio, komencis demandi:

— Kio do? Kio tie okazas? Ĉu oni jam batalas?

Petronio kaptis aeron en la bruston, spiris profunde kaj respondis:

— Je Polukso! Ili ŝvitas kaj odoraĉas! Oni donu al mi *epiimon*,<sup>289</sup> aŭ mi svenos.

Poste li sin turnis al Nerono.

— Mi promesis al ili, — li diris, — grenon, olivoleon, malfermon de la ĝardenoj kaj cirkoludojn. Ili adoras cin denove kaj kriaĉas per la fenditaj lipoj je cia gloro. Dioj, kiel malagrablan odoron havas tiu plebo!

— Mi havis la pretorianojn pretaj, — ekkriis Tigeleno. — Kaj se ci ilin ne trankviligus, la kriemuloj eksilentus

<sup>289</sup> Lat. *ēpīlimma* — malkara aromaĵo kun fortaodoro.

por ĉiam. Domaĝe, Cezaro, ke ci ne permesis al mi uzi forton.

Petronio rigardis iom la parolanton, movis la ŝultrojn kaj diris:

— Tio ne estas ankoraŭ perdita. Eble ci devos ĝin uzi morgaŭ.

— Ne, ne! — diris Nerono. — Mi ordonos malfermi al ili la ĝardenojn kaj disdoni grenon. Dankon al ci, Petronio! Mi aranĝos cirkoludojn, kaj tiun kanton, kiun vi aŭdis hodiaŭ, mi kantos publike.

Dirinte ĉi tion, li metis la manon sur la ŝultron de Petronio, silentis momente, kaj fine, trankviliĝinte, demandis:

— Diru sincere: kia mi ŝajnis al ci, kiam mi kantis?

— Ci indis la spektaklon, kiel la spektaklo indis cin, — respondis Petronio.

Poste li sin turnis refoje al la brulo.

— Sed ni rigardu ankoraŭ, — li diris, — kaj adiaŭu la malnovan Romon.

## Ĉapitro 48<sup>a</sup>

La vortoj de la apostolo inspiris fidon en la animojn de la kristanoj. La fino de la mondo ĉiam ŝajnis al ili proksima, ili komencis tamen kredi, ke la terura juĝo ne venos tuj kaj ke antaŭe ili vidos eble ankoraŭ finon de la regado de Nerono, kiun ili konsideris kiel regadon de Antikristo, kaj punon de Dio por liaj venĝon vokantaj krimoj. Kuraĝigitaj en siaj koroj, ili komencis disiri post la fino de la preĝoj kaj reveni en siajn provizorajn rifuĝejojn, eĉ en Transtiberon, ĉar venis famo, ke la fajro, metita en dekkelkaj lokoj, direktis sin kun ventoŝanĝo al la rivero kaj, konsuminte tie kaj ie, kion ĝi povis konsumi, ĉesis vastiĝi.

La apostolo, akompanate de Vinicio kaj de la sekvanta ilin Hilonio, ankaŭ forlasis la subteraĵon.

La juna tribunuso ne kuraĝis interrompi lian preĝon; dum kelka tempo li paŝis do en silento, nur per la okuloj petegante kompaton kaj tremante de maltrankvilo. Sed multaj personoj venadis ankoraŭ kisi la manojn kaj la vestrandon de la apostolo, patrinoj etendadis al li siajn infanojn, aliaj genuiĝadis en la malluma, longa pasejo kaj, levante supren la lampojn, petis lian benon, aliaj fine, irante preter li, kantis, tiel ke estis konvena momento nek por demando, nek por respondo. Same estis ankaŭ en la

intermonteto. Nur kiam ili eliris sur pli liberan spacon, de kiu oni vidis jam la brulantan urbon, la apostolo, kruco-signinte ĝin trifoje, sin turnis al Vinicio kaj diris:

— Ne timu. Proksime de ĉi tie estas kabano de fosisto, kie ni trovos Ligian kun Lino kaj kun ŝia fidela servanto. Kristo, kiu ŝin al ci destinis, gardis ŝin por ci.

Vinicio ŝanceliĝis kaj apogis sin per la mano sur roko. La vojo el Ancio, la okazoj apud la muroj, la serĉado de Ligia meze de la varmegaj fumoĵoj, la sendormo kaj la terura maltrankvilo pro ŝi elĉerpis preskaŭ ĉiujn liajn fortojn, kaj je la lastaj senigis lin la sciigo, ke tiu persono, plej kara al li en la mondo, estas proksime kaj ke post momento li ŝin ekvidos. Ekregis lin subite malforteco tiel granda, ke li ŝovis sin al la piedoj de la apostolo kaj, ĉirkaŭpreninte liajn genuojn, restis tiel, ne povante eldiri eĉ vorton.

Kaj la apostolo, defendante sin de danko kaj honoro, diris:

— Ne al mi, ne al mi, sed al Kristo!

— Kia potenco dio! — aŭdiĝis de malantaŭe la voĉo de Ĥilono. — Sed mi ne scias, kion mi faru pri la muloj, kiuj atendas nin proksime.

— Leviĝu kaj sekvu min, — diris Petro, prenante la junan viron je la mano.

Vinicio leviĝis. Ĉe la lumo de la brulego oni vidis lar-

mojn, gutantajn de lia vizaĝo, pala pro emocio. Liaj lipoj tremis, kvazaŭ li preĝus.

— Ni iru, — li diris.

Sed Hîlono ripetis:

— Sinjoro, kion mi faru pri la muloj, kiuj atendas? Eble tiu ĉi respektinda profeto preferus rajdi ol piediri?

Vinicio mem ne sciis, kion respondi, sed ekaŭdinte de Petro, ke la kabano de la fosisto trovas sin tute proksime, li diris:

— Rekonduku la mulojn al Makreno.

— Pardonu, sinjoro, ke mi memorigas al ci la domon en Ameriolo. Kontraŭ tiu terura brulo facile estas forgesi pri tia bagatelaĵo.

— Ci ricevos ĝin.

— Ho! Nepo de Numo Pompilio, ĉiam mi estis certa, sed nun, kiam la promeson aŭdis ankaŭ ĉi tiu grandanima apostolo, mi eĉ ne memorigas, ke ci promesis al mi ankaŭ vinberejon. Paco al ci. Mi cin retrovos, sinjoro. Paco al ci.

Kaj ili respondis:

— Kaj al ci.

Poste ambaŭ direktiĝis dekstren, al la montetoj. Envoje Vinicio diris:

— Sinjoro, lavu min per la akvo de bapto, por ke mi povu nomiĝi vera konfesanto de Kristo, ĉar mi amas lin



per ĉiuj fortoj de mia animo. Lavu min rapide, ĉar mi estas jam preta en la koro. Kaj kion li ordonos al mi, tion mi faros, sed ci diru al mi, kion pli mi povus fari.

— Amu la homojn, kiel ciajn fratojn, — respondis la apostolo, — ĉar nur per amo ci povas al li servi.

— Jes! Mi tion komprenas kaj sentas. Estante infano, mi kredis je la romaj dioj, sed mi ilin ne amis, kaj tiun Solan mi amas tiel, ke kun ĝojo mi fordonus por li la vivon.

Kaj li komencis rigardi la ĉielon, ripetante kun fervoro:

— Ĉar li estas Sola! Ĉar li sola estas bona kaj kompartema! Do se estus eĉ pereanta ne nur tiu ĉi urbo, sed la tuta mondo, lin solan mi konfesas kaj lin solan mi adoras!

— Kaj li benos cin kaj cian hejmon, — finis la apostolo. Dume ili flankiĝis en alian intermonteton, en kies fino oni vidis malklaran lumeton. Petro montris ĝin per la mano kaj diris:

— Jen la kabano de la fosisto, kiu donis al ni rifuĝon, kiam, reveninte kun la malsana Lino el Ostriano, ni ne povis penetri en Transtiberon.

Post momento ili alvenis. La kabano estis pli ĝuste kaverna, kavigita en roka abruptaĵo, kiun oni de ekstere fermis per muro, farita el argilo kaj kanoj. La pordo estis fermita, sed tra malfermaĵo, kiu anstataŭis fenestron, oni

vidis la internon, lumigitan per fajro.

Iu malhela, grandega figuro leviĝis renkonte al la venintoj kaj komencis demandi:

— Kiuj vi estas?

— Servantoj de Kristo, — respondis Petro. — Pacon al ci, Urso.

Urso sin klinis al la piedoj de la apostolo; poste, rekoninte Vinicion, li kaptis lian manon je la artikolo kaj levis ĝin al la buŝo.

— Ĉu ankaŭ ci, sinjoro? — li diris. — Benata estu la nomo de la Ŝafido pro la ĝojo, kiun ci kaŭzos al Kallina.

Dirinte tion, li malfermis la pordon kaj ili eniris. La malsana Lino kuŝis sur fasko da pajlo kun malgrasa vizaĝo kaj frunto flava, kiel eburo. Apud la fajro sidis Ligia, tenante en la mano fasketon da malgrandaj fiŝoj, vicigitaj sur ŝnureto kaj destinitaj videble por la vespermanĝo.

Okupite pri detirado de la fiŝoj de la ŝnureto kaj konvinkite, ke la eniranto estas Urso, ŝi tute ne levis la okulojn. Sed Vinicio alproksimiĝis kaj, elparolinte ŝian nomon, etendis al ŝi la brakojn. Tiam ŝi leviĝis rapide: fulmo de miro kaj ĝojo trakuris ŝian vizaĝon, kaj sen vorto, kiel infano, retrovanta post tagoj de teruro kaj pereco sian patron aŭ patrinon, ŝi ĵetis sin en liajn malfermitajn brakojn.

Li ĉirkaŭprenis ŝin kaj dum kelka tempo ŝin premis al la brusto kun tia ĝojekstazo, kvazaŭ ŝi estus mirakle savita. Poste do, disiginte la brakojn, li prenis per la manoj ŝiajn tempiojn, kisis la frunton, la okulojn, kaj denove ŝin ĉirkaŭbrakis, ripetante ŝian nomon, poste klinis sin al ŝiaj genuoj kaj manoj, salutis ŝin, adoris, honoris. Lia ĝojo estis simple senlima, same kiel lia amo kaj feliĉo.

Fine li komencis rakonti al ŝi, kiel li alkuris el Ancio, kiel li serĉis ŝin apud la urbaj muregoj kaj meze de la fumo, en la domo de Lino, kiom da ĉagreno, maltrankvilo kaj teruro li suferis, antaŭ ol la apostolo montris al li ŝian rifuĝejon.

— Sed nun, — li parolis, — kiam mi cin retrovis, mi ne lasos cin ĉi tie, kontraŭ tiu fajro kaj la furiozaj amasoj. Homoj murdas sin reciproke apud la muroj, sklavo, ribelas kaj rabas. Dio sola scias, kiaj novaj plagoj povas ankoraŭ frapi Romon. Sed mi savos cin, Ligia, kaj mi savos vin ĉiujn. Ho mia kara!... Ĉu vi volas iri kun mi Ancion? Tie ni prenos ŝipon kaj veturos Sicilion. Miaj posedaĵoj estas viaj posedaĵoj, miaj domoj estas viaj domoj. Aŭskultu min! En Sicilio ni trovos la Plaŭciojn, mi redonos cin al Pomponia kaj poste prenos cin el ŝiaj manoj. Ja ci, mia kara, ne timas min plu. Bapto ankoraŭ ne lavis min, sed demandu Petron, ĉu antaŭ momento, irante al ci, mi ne

diris, ke mi volas esti vera konfesanto de Kristo, kaj ĉu mi lin ne petis, ke li baptu min, eĉ en tiu ĉi kabano de la fosisto. Fidu al mi, Ligia, kaj vi ĉiuj fidu al mi.

Ligia aŭskultis kun lumanta vizaĝo liajn vortojn. Ĉiuj ili ĉi tie, antaŭe pro persekutoj flanke de la judoj, kaj nun pro la brulo kaj ĥaoso, kaŭzita de la katastrofo, vivis efektive en senĉesa necerteco kaj timo. Forveturo en la trankvilan Sicilion prezentus finon de ĉiuj maltrankviloj kaj kune komencus novan epokon de feliĉo en ilia vivo. Plie, se Vinicio volus kunpreni nur Ligian solan, ŝi certe kontraŭstarus al la tento, ne volante forlasi Petron la apostolon kaj Linon, sed Vinicio diris ja al ili: «Iru kun mi! Miaj posedaĵoj estas viaj posedaĵoj, miaj domoj estas viaj domoj!»

Do, klininte sin al lia mano por ĝin kisi signe de obeo, ŝi diris:

— Cia hejmofajro estas mia hejmofajro.

Poste, hontiĝinte, ke ŝi eldiris la vortojn, kiujn, laŭ la romana moro, diradis nur novedzinoj ĉe la edziniĝo, ŝi ekflamis de ruĝo kaj staris en la brilo de la fajro kun mallevita kapo, necerta, ĉu oni ŝin ne riproĉos pro tio.

Sed en la okuloj de Vinicio bildis sin nur senlima adoro. Li turnis sin poste al Petro kaj ekparolis denove:

— Romo brulas laŭ la ordono de Nerono. Jam en An-

cio li plendis, ke li neniam vidis grandan brulon. Sed se li ne hezitis antaŭ tia krimo, pensu, kio ankoraŭ povas okazi. Kiu scias, ĉu, veniginte la legiojn, li ne ordonos al ili elmurdi la loĝantojn? Kiu scias, kiaj proskripcioj sekvos, kiu scias, ĉu post la plago de fajro ne venos la plago de civila milito, de murdoj kaj de malsato? Savu vin, kaj ni savu Ligian. Tie ni traatendos trankvile la uraganon, kaj kiam ĝi pasos, vi revenos por semi denove vian semon.

Ekstere, flanke de la Kampo Vatikana, aŭdiĝis, kvazaŭ por konfirmi la timojn de Vinicio, iaj malproksimaj krioj, plenaj je furiozeco kaj teruro. En la sama momento alvenis la fosisto, la mastro de la kabano, kaj rapide ferminte la pordon, ekkriis:

— Homoj murdas sin reciproke apud la cirko de Nerono. Sklavoj kaj gladiatoroj ekatakis civitanojn.

— Ĉu vi aŭdas? — diris Vinicio.

— Pleniĝas la mezuro, — diris la apostolo, — kaj la battoj estos, kiel senlima maro.

Poste li sin turnis al Vinicio kaj, montrante Ligian, diris:

— Prenu tiun ĉi knabinon, kiun Dio al ci destinis, kaj savu ŝin. Lino, kiu estas malsana, kaj Urso forveturu kun vi.

Sed Vinicio, kiu ekamis la apostolon per la tuta forto

de sia pasia animo, vokis:

— Mi ĵuras al ci, majstro, ke mi ne lasos cin ĉi tie al pereo.

— Kaj la Sinjoro benos cin por cia bonvolo, — respondis la apostolo, — sed ĉu ci aŭdis, ke Kristo trifoje ripetis al mi apud la lago: «Paŝtu miajn ŝafojn!»

Vinicio eksilentis.

— Se do ci, al kies zorgado neniu min konfidis, diras, ke ci ne lasos min ĉi tie al pereo, kiel ci volas, ke mi forlasu mian ŝafaron en la tago de la sortobato? Kiam estis fulmotondro sur la lago kaj kiam ni timis en niaj koroj, li ne forlasis nin, kiel do mi, lia fidela servanto, ne sekvu la ekzemplon de mia Sinjoro?

Subite Lino levis sian malgrasan vizaĝon kaj demandis:

— Kaj kiel mi ne sekvu cian ekzemplon, reprezentanto de la Sinjoro?

Vinicio komencis ŝovi la manon sur la kapo, kvazaŭ li batalus kontraŭ si mem aŭ baraktus kontraŭ siaj pensoj; poste, kaptinte la manon de Ligia, li diris per voĉo, en kiu vibris la energio de roma soldato:

— Aŭskultu min, Petro, Lino kaj ci, Ligia! Mi parolis, kion diktis al mi mia homa saĝo, sed vi havas alian, kiu pensas ne pri sia sekureco, sed pri la ordonoj de la Savin-

to. Jes! Mi tion ankoraŭ ne komprenis kaj eraris, ĉar la vualo ne estas ankoraŭ forigita de miaj okuloj kaj la antaŭa naturo resonas en mi. Sed ĉar mi amas Kriston kaj volas esti lia servanto, tial, kvankam la afero koncernas ion, pli gravan al mi ol mia kapo, mi nun genuiĝas antaŭ vi kaj ĵuras, ke ankaŭ mi plenumos la ordonon de amo kaj ne forlasos miajn fratojn en la tago de la sortobato!

Dirinte ĉi tion, li ekgenuis kaj subite ekregis lin ekstazo: la okulojn kaj la manojn li levis supren kaj komencis voki:

— Ĉu mi komprenas cin jam, ho Kristo! Ĉu mi jam indas cin?

Liaj manoj tremis, la okuloj ekbrilis de larmoj, la korpon skuis tremo de kredo kaj amo, kaj Petro la apostolo prenis argilan amforon kun akvo kaj, proksimiĝinte al li, diris solene:

— Mi cin baptas, en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Spirito, amen!

Tiam religia ekstazo ekregis ĉiujn ĉeestantojn. Ŝajnis al ili, ke la kabano pleniĝas per ia supertera lumo, ke ili aŭdas superteran muzikon, ke la roko de la kaverno malfermiĝas super iliaj kapoj, ke el la ĉielo flugas al ili amasoj da anĝeloj, kaj fore, supre, vidiĝas kruco kaj manoj tranajlitaj, benantaj.

Dume el ekstere aŭdiĝadis la krioj de la batalantoj kaj la bruo de la flamoj el la brulanta urbo.

## Ĉapitro 49<sup>a</sup>

Homaj amasoj tendostariĝis en la grandiozaj imperiestraj ĝardenoj, en la iamaj ĝardenoj de Domicia kaj Agripino, sur la Kampo de Marso, en la ĝardenoj de Pompeo, Salustio kaj Mecenaso. Oni okupis portikojn, konstruaĵojn destinitajn por pilkludo, ĉarmajn somerdomojn kaj budojn konstruitajn por bestoj. Pavoj, fenikopteroj, cignoj kaj strutoj, gazeloj kaj antilopoj el Afriko, cervoj kaj kapreoloj iĝis viktimoj de la amasoj. Oni komencis venigi manĝoprovizojn el Ostio tiel abunde, ke sur flosoj kaj diversspecaj ŝipoj oni povis iri de unu bordo de Tibero al la alia, kiel sur ponto. Oni disdonadis grenon treege malkare, por la prezo de tri sestercoj, kaj al malriĉuloj tute senpage. Oni venigis grandegajn provizojn da vino, olivoleo kaj kaŝtanoj, el montaroj oni alpeladis ĉiutage amasojn da bovoj kaj ŝafoj. Mizeruloj, kiuj antaŭ la brulo rifuĝadis en la malriĉaj stratetoj de Suburo kaj en la ordinara tempo suferadis malsaton, vivis nun pli bone ol antaŭe. La minaco de malsato estis decide forigita, pli malfacile estis tamen antaŭgardi kontraŭ perforto, raboj kaj malleĝaĵoj. La vago vivo sekurigis senpunecon al rabuloj, tiom pli, ke ili



proklamadis sin adorantoj de la imperiestro kaj ne avaris al li aplaŭdojn, kie ajn li montriĝis. Ĉar, krome, la oficoj pro la forto de la faktoj malaktiviĝis kaj kune mankis loke sufiĉaj armofortoj, kiuj povus kontraŭagi la memvolajn agojn, tial en la urbo, loĝata de friponoj el la tuta tiama mondo, havis lokon aferoj super la homa imago. Ĉiunokte okazadis bataloj, murdoj, forkaptoj de virinoj kaj infanoj. Apud la pordego Mugiona, kie estis haltejo por brutaroj alpelataj el Kampanio, okazadis bataloj, en kiuj pereadis centoj da homoj. Ĉiumatene la bordoj de Tiberio svarmis de dronigitaj korpoj, kiujn neniu enterigis kaj kiuj, rapide putrante pro la varmego, plenigadis la aeron per sufoka malbonodoro. En la tendaro komenciĝis malsanoj kaj homoj pli timemaj antaŭvidis grandan epidemion.

Kaj la urbo brulis senĉese. Nur en la sesa tago la brulo, trafinte la malplenajn spacojn de Eskvilino, sur kiuj oni intence detruis grandan nombron da domoj, komencis malfortiĝi. Sed amasoj da ardanta karbo lumis ankoraŭ tiel brile, ke la popolo ne volis kredi, ke ĝi estas jam fino de la plago. Efektive en la sepa tago la brulo reeksplodis kun nova forto en la konstruaĵoj de Tigeleno, sed pro manko de materialo ĝi daŭris jam mallonge. Nur domoj trae bruligitaj faladis ankoraŭ tie kaj ie, ŝprucigante su-

pren flamajn serpentojn kaj kolonojn da fajreroj. Sed iom post iom la funde ardantaj ruboj komencis supraĵe iĝi nigraj. La ĉielo post sunsubiro ĉesis lumi de sanga brulruĝo kaj nur nokte en la vasta nigra dezerto saltis bluaj flamlangoj, eliĝantaj el amasoj da karbo.

El la dek kvar kvartaloj de Romo restis apenaŭ kvar, kalkulante en tio ankaŭ Transtiberon. La ceteron formangiĝis la flamoj. Kiam fine cindriĝis la karbamasoj, oni vidis de Tibero ĝis Eskvilino grandegan spacon grizan, malgaj-an, senvivan, sur kiu elstaris vicoj da kamentuboj, kvazaŭ tombaj kolonoj en tombejoj. Inter tiuj kolonoj vagis tage funebraj aroj da homoj, serĉantaj jen karajn objektojn, jen la ostojn de karaj personoj. Nokte hundoj hurlis sur la cindraro kaj sur la ruinoj de la iamaj domoj.

La tuta malavareco kaj helpo, kiun Nerono elmontris al la popolo, ne retenis minacojn kaj eksciton. Kontenta estis sole amaso da friponoj, ŝtelistoj kaj senhejmaj mizeruloj, kiuj povis ĝissate manĝi, trinki kaj rabi. Sed homoj, kiuj perdis siajn plej proksimajn personojn kaj havaĵojn, ne lasis pacigi sin per la malfermo de la ĝardenoj, nek per la disdonado de greno, nek per la promesoj de cirkoludoj kaj donacoj. La malfeliĉo estis tro granda kaj tro senekzempla. Aliajn, en kiuj bruletis ankoraŭ ia fajrero de amo al la urbo-patrujo, malesperigis la famo, ke la malnova

onomo *Roma* devas malaperi de la supraĵo de la tero kaj ke Nerono intencas konstrui sur la cindroj novan urbon, nomotan *Neropolis*. La ondo de malkontenteco ŝvelis de tago al tago, kaj malgraŭ la flatoj de la aŭgustanoj, malgraŭ la mensogoj de Tigeleno, Nerono, sentema al la favoro de la amasoj, kiel neniu el la antaŭaj imperiestroj, pensis kun teruro, ke en tiu silenta batalo pro vivo aŭ morto, kiun li faris kontraŭ la patricioj kaj la senato, li povas resti senapoga. La aŭgustanoj mem estis ne malpli teruritaj, ĉar ĉiu morgaŭo povis alporti al ili pereon. Tigeleno pripensis venigon de kelkaj legioj el Anatolio. Vatinio, kiu ridis eĉ tiam, kiam oni lin vangofrapis, perdis la bonhumoron; Vitelio perdis la apetiton.

Aliaj konsilis inter si, kiel forturni la danĝeron, ĉar neniu malkonsciis, ke se iu eksplodo polvigus la imperiestron, tiam, eble krom la sola Petronio, eĉ ne unu el la aŭgustanoj savus sian vivon. Al iliaj influoj oni ja atribuis la frenezaĵojn de Nerono, al iliaj inspiroj oni imputis ĉiujn krimojn, kiujn li plenumis. La malamo kontraŭ ili estis preskaŭ pli granda ol kontraŭ li mem.

Ili komencis do streĉi la mensojn, pensante, kiel senŝarĝigi de la respondeco pri la bruligo de la urbo. Sed volante senŝarĝigi sin mem, ili devis purigi de la suspektoj ankaŭ Nerono, ĉar alie neniu kredus, ke ili ne estis la

kaŭzintoj de la malfeliĉego. Tigeleno interkonsilis tiucele kun Domicio Afro kaj eĉ kun Seneko, kvankam li malamegis la maljunan filozofon. Popea, komprenante ankaŭ, ke la pereco de Nerono estus kune verdikto kontraŭ ŝi, petis konsilon de siaj konfidatoj kaj hebreaj pastroj, ĉar oni supozis ĝenerale, ke de kelkaj jaroj ŝi konfesis la kredon je Jehovo. Nerono mem elpensadis rimedojn, ofte terurajn, pli ofte arlekenajn, kaj alterne li subiĝadis al teruro aŭ ludis, kiel infano, antaŭ ĉio li tamen plendis.

Foje en la domo de Tiberio, kiu estis savita de la brulo, daŭris longa kaj senefika interkonsilo. Petronio proponis lasi for la zorgojn kaj veturi Grekujon, poste Egiptujon kaj Anatolion. La vojaĝo estis jam delonge intencata, kial do ĝin prokrasti, se en Romo estas malgaje kaj danĝere.

Nerono akceptis la konsilon kun fervoro, sed Seneko, pensinte dum momento, diris:

— Veturi estos facile, sed poste reveni — malpli facile.

— Je Heraklo! — respondis Petronio, — reveni oni povus fronte de la aziaj legioj.

— Tiel mi faros, — ekkriis Nerono.

Sed Tigeleno komencis kontraŭparoli. Li mem sciis nenion elpensi, kaj se la ideo de Petronio venus en lian kapon, sendube li deklarus ĝin kiel savan, nun tamen gravis al li, ke Petronio ne montriĝu refoje la sola homo, kiu

en malfacilaj momentoj scias savi ĉion kaj ĉiujn.

— Aŭskultu min, dia! — li diris, — la konsilo estas pe-reiga! Antaŭ ol ci atingos Ostion, komenciĝos civila mi-lito; kiu scias, ĉu iu el la ankoraŭ vivantaj posteuloj de la dia Aŭgusto decidos proklami sin imperiestro, kaj tiam kion ni faros, se la legioj partiiĝos kun li?

— Ni faros tion, — respondis Nerono, — ke antaŭe ni klopodos, ke malestu la posteuloj de Aŭgusto. Ili jam estas nemultaj, facile do estos liberiĝi de ili.

— Oni povas tion fari, sed ĉu nur tio gravas? Miaj soldatoj eĉ hieraŭ aŭdis en la amaso, ke imperiestro devus esti viro tia, kiel Trazeo.

Nerono ekmordis la lipojn. Post momento li tamen levis la okulojn supren kaj diris:

— Nesatigeblaj sendankuloj. Ili havas sufiĉe da greno kaj da karbo, sur kiu ili povas baki flanojn, kion pli ili volas?

Al tio Tigeleno diris:

— Venĝon.

Sekvis silento. Subite Nerono ekstaris, levis la manon supren kaj diris:

*La koroj serĉas venĝon, kaj venĝo — viktimon.*

Poste, forgesinte pri ĉio, li vokis kun radiantata vizaĝo:

— Oni donu al mi tabuletojn kaj skribilon, por ke mi

notu tiun ĉi verson. Neniam Lukano komponis ion similan. Ĉu vi rimarkis, ke mi trovis ĝin en unu sekundo?

— Ho, senkompara! — respondis kelkaj voĉoj.

Nerono notis la verson kaj diris:

— Jes! La venĝo serĉas viktimon.

Poste li rigardis ĉirkaŭen, al la ĉeestantoj.

— Kaj se ni disvastigus la famon, ke Vatinio ordonis bruligi la urbon, kaj oferus lin al la venĝo de la popolo?

— Ho dia! Kio mi estas? — ekkriis Vatinio.

— Vere! Oni bezonas iun pli grandan ol ci... Vitelion?

Vitelio paliĝis — kaj tamen ekridis.

— Mia graso, — li diris, — povus nur refajrigi la brulon.

Sed Nerono pensis pri io alia, ĉar li serĉis en la animo viktimon, kiu efektive povus satigi la koleron de la popolo, kaj li trovis, kion li serĉis:

— Tigeleno, — li diris post momento, — ci bruligis Romon!

La ĉeestantojn trakuris tremo. Ili komprenis, ke ĉi-foje Nerono ĉesis ŝerci kaj ke venas momento riĉa je sekvoj.

Kaj la vizaĝo de Tigeleno kuntiriĝis, kiel faŭko de mordopreta hundo.

— Mi bruligis Romon laŭ cia ordono, — li diris.

Ili komencis rigardi unu la alian, kiel du demonoj. Se-

kvis tia silento, ke oni aŭdis zumadon de muŝoj, flugantaj tra la atrio.

— Tigeleno, — ekparolis Nerono, — ĉu ci min amas?

— Ci scias, sinjoro.

— Oferu cin por mi.

— Dia Cezaro, — respondis Tigeleno, — kial ci donas al mi dolĉan trinkaĵon, kiun mi ne povas levi al buŝo? La popolo murmuris kaj ribelas, ĉu ci volas, ke ankaŭ la pretorianoj komencu ribeli?

La sento de teruro ekpremis la korojn de la ĉeestantoj. Tigeleno estis prefekto de la pretorio kaj liaj vortoj havis simple la sencon de minaco. Nerono mem komprenis tion, kaj lia vizaĝo kovriĝis per paleco.

Subite eniris Epafrodito, liberigito de la imperiestro, kun la sciigo, ke la dia aŭgustino deziras tuj vidi Tigelenson, ĉar estas ĉe ŝi homoj, kiujn la prefekto devas elaŭskulti.

Tigeleno riverencis al Nerono kaj eliris kun vizaĝo trankvila kaj malestima. Jen, kiam oni volis lin ekbati, li montris la dentojn, li konigis, kio li estas, kaj konante la timemon de Nerono, li estis certa, ke tiu mondreganto neniam kuraĝos levi kontraŭ lin la manon.

Kaj Nerono sidis momente en silento, sed vidante, ke la ĉeestantoj atendas de li iun vorton, li diris:

— Mi elvartis serpenton ĉe la sino.

Petronio movis la ŝultrojn, kvazaŭ volante diri, ke al tia serpento ne estas malfacile frakasi la kapon.

— Kion ci diras? Parolu, konsilu! — ekkriis Nerono, rimarkinte lian movon, — al ci sola mi fidas, ĉar ci havas pli da saĝo ol ili ĉiuj, kaj ci amas min.

Petronio jam estis dironta: «Nomu min prefekto de la pretorio, kaj mi transdonos al la popolo Tigelenon kaj kvietigos en unu tago la urbon». Sed lia denaska maldiligenteco superis. Esti prefekto signifis, ĝuste dirante, porti sur la ŝultroj la personon de la imperiestro kaj milojn da publikaj aferoj. Por kio li faru al si tiujn zorgojn? Ĉu ne estas pli bone legi versaĵojn en la ĉarma biblioteko, rigardi vazojn kaj statuojn, aŭ, tenante ĉe la brusto la dian korpon de Eŭniko, fingroludi per ŝiaj oraj haroj kaj klinadi la buŝon al ŝia korala buŝo?

Li do diris:

— Mi konsilas veturi Aĥajon.

— Ha, — respondis Nerono, — mi atendis de ci ion pli.

La senato min malamegas. Se mi forveturos, kiu povas garantii, ke ili ne ekribelos kontraŭ mi kaj ne proklamos iun alian imperiestro? La popolo estis al mi iam fidela, sed nun ĝi sekvas ilin ... Je Hadeso! Se tiu senato kaj tiu popolo havus unu solan kapon!...



— Permesu diri al ci, ho dia, ke volante konservi Romon, oni devas konservi almenaŭ kelkajn romanojn, — diris Petronio kun rideto.

Sed Nerono komencis plendi:

— Kion mi havas de Romo kaj de la romanoj? Oni aŭskultus min en Aĥajo. Ĉi tie ĉirkaŭas min nur perfido. Ĉiuj min forlasas! Ankaŭ vi pretas min perfidi! Mi scias tion, mi scias! Vi eĉ ne pensas, kion diros pri vi la postaj generacioj, se vi forlasos tian artiston, kiel mi.

Ĉe tio li manfrapis la frunton kaj ekkriis:

— Vere!... Meze de tiuj zorgoj mi mem forgesas, kio mi estas.

Dirinte tion, li sin turnis al Petronio kun vizaĝo jam tute sereniĝinta.

— Petronio, — li diris, — la popolo murmuris, sed se mi prenis liuton kaj irus kun ĝi sur la Marsan kampon, se mi kantus al ili tiun kanton, kiun vi aŭdis dum la brulo, ĉu ci dubas ke mi kortuŝus ilin per mia kanto, kiel iam Orfeo kortuŝis la sovaĝajn bestojn?

Al tio respondis Tulio Seneciono, kiu deziris reveni plej baldaŭ al siaj sklavinoj, venigitaj el Ancio, kaj malpacienca jam delonge:

— Sendube, Cezaro, se oni lasus cin komenci.

— Ni veturu Grekujon! — diris Nerono, tedite.

Sed en la sama momento eniris Popea, kaj post ŝi Tigeleno. La okuloj de la ĉeestantoj direktis sin malgraŭvole al li, ĉar neniam triumfanto surveturis tiel fiere Kapitolon, kiel li ekstaris antaŭ la imperiestro.

Poste li komencis paroli malrapide kaj klare, per voĉo, en kiu sonis kvazaŭ grinco de fero:

— Aŭskultu min, Cezaro, ĉar mi povas diri al ci: mi trovis! La popolo avidas venĝon kaj viktimon, ne unu tamen, sed centojn kaj milojn. Ĉu ci aŭdis iam, sinjoro, kiu estis Ĥresto, krucumita de Poncio Pilato? Kaj ĉu ci scias, kiuj estas kristanoj? Ĉu mi ne rakontis al ci pri iliaj krimoj kaj senhontaj ritoj, pri iliaj antaŭdiroj, ke la mondo pereos de fajro? La popolo malamas ilin kaj suspektas. Neniu vidis ilin en la temploj, ĉar niajn diojn ili konsideras malbonaj spiritoj, neniam ili estas en stadiono, ĉar ili malestimias la vetkurojn. Neniam la manoj de iu kristano honoris cin per aplaŭdo. Neniam iu el ili konfesis cin dio. Ili estas malamikoj de la homa gento, malamikoj de la urbo kaj de ci, sinjoro. La popolo murmuris kontraŭ ci, sed ne ci, Cezaro, ordonis al mi bruligi Romon, kaj ne mi ĝin bruligis ... La popolo soifas venĝon — ĝi havu venĝon. La popolo soifas sangon kaj cirkoludojn — ĝi havu ilin. La popolo suspektas cin — ĝiaj suspektoj direktiĝu aliflanken.

Nerono aŭskultis komence kun granda miro. Sed laŭgrade kiel Tigeleno parolis, la aktora vizaĝo de la imperiestro komencis ŝanĝi sin kaj alpreni alterne la esprimon de kolero, doloro, kompato kaj indigno. Subite li leviĝis kaj, deĵetinte la togon, kiu falis al liaj piedoj, etendis supren ambaŭ manojn kaj momente restis tiel en silento.

Fine li ekparolis per voĉo de tragedia aktoro:

— Zeŭso, Apolono, Hero, Ateno, Persefono kaj vi ĉiuj senmortaj dioj, kial vi ne donis al ni vian helpon? Kian malbonon faris la malfeliĉa urbo al tiuj krueluloj, ke ili ĝin tiel senkompate bruligis?

— Ili estas malamikoj de la homa gento kaj de ci, sinjoro, — diris Popea.

Kaj aliaj komencis voki:

— Faru justecon! Punu la brulmetintojn! La dioj mem volas venĝon!

Li sidiĝis, mallevis la kapon al la brusto kaj denove silentis, kvazaŭ tondrofrapita de la malnobleco, pri kiu li ekaŭdis. Sed post momento li ekskuis la manojn kaj ekparolis:

— Kiaj punoj kaj kiaj torturoj indas tian krimon?... Sed la dioj min inspiros kaj kun la helpo de la potencoj de Tartaro mi faros al mia malfeliĉa popolo tian spektaklon, ke dum jarcentoj ĝi min danke rememoros.

La frunton de Petronio kovris subite nuboj. Li ekpensis pri la danĝero, kiu ekpezos super Ligia, super Vinicio, kiun li amis, kaj super ĉiuj tiuj homoj, kies instruon li malakceptis, sed pri kies senkulpeco li estis konvinkita. Li ankaŭ ekpensis, ke komenciĝos unu el tiuj sangaj orgioj, kiujn ne toleris liaj okuloj de belamanto. Sed antaŭ ĉio li diris al si: «Mi devas savi Vinicion, kiu freneziĝos, se tiu knabino pereos», kaj tiu konsidero superis ĉiujn aliajn, ĉar Petronio bone komprenis, ke li komencas ludon tiel danĝeran, kian neniam en la vivo li ludis.

Li komencis tamen paroli facilmaniere kaj senzorge, kiel li parolis ordinare, kritikante aŭ mokante nesufiĉe estetikaĵojn de la imperiestro kaj de la aŭgustanoj:

— Vi trovis do la viktimojn! Bone! Vi povas eĉ sendi ilin sur arenojn aŭ vesti per la «doloraj tunikoj». Ankaŭ bone! Sed aŭskultu min: vi havas la aŭtoritaton, vi havas la pretorianojn, vi havas la forton, estu do sinceraj, tiam almenaŭ, kiam neniu vin aŭdas. Trompu la popolon, sed ne vin mem. Transdonu al la popolo la kristanojn, kondamnu ilin al torturoj laŭ via plaĉo, havu tamen la kuraĝon diri al vi, ke ne ili bruligis Romon!... Fi! Vi nomas min arbitro de eleganteco, do mi deklaras, ke mi malamas mizerajn komediojn. Fi! Ha, kiel ĉio tio memorigas al mi la teatrajn budojn apud la Azena pordego<sup>290</sup>, kie la aktoroj,

por distri la antaŭurban publikon, ludas diojn kaj reĝojn, kaj post la spektaklo trinkas acidan vinon kun cepo aŭ ricevas batojn. Estu vere dioj kaj reĝoj, ĉar mi diras al vi, ke vi povas al vi permesi tion. Koncerne cin, Cezaro, ci minacis nin per la juĝo de la postaj generacioj, sed pripensu, ke ankaŭ cin ili juĝos. Je la dia Klio! Nerono la mondreganto, Nerono la dio bruligis Romon, ĉar li estis tiel potenca sur la tero, kiel Zeŭso sur Olimpo. Nerono la poeto tiel amis poezion, ke li oferis por ĝi la patrujon! De la komenco de la mondo neniu faris ion similan. Mi petegas cin, en la nomo de la naŭ nimfoj Libetraj<sup>291</sup>, ne rezignu tian gloron, ĉar kantoj pri ci sonos ĝis la fino de la jarcentoj. Kio estos kompare kun ci Priamo? Kio Agamemnono? Kio Aĥilo? Kio la dioj mem? Ne gravas, ĉu la bruligo de Romo estas faro bona, sed ĝi estas granda kaj eksterordinara! Kaj krome mi diras al ci, ke la popolo ne levos kontraŭ cin la manon. Malvere! Havu kuraĝon! Gardu cin de faroj malindaj je ci, ĉar al ci minacas nur tio, ke la postaj generacioj povos diri: «Nerono bruligis Romon, sed estante malgrandanima imperiestro kaj malgrandanima poeto, li malkonfesis sian grandan faron pro timo kaj ŝarĝis per la

<sup>290</sup> Anakronismo? La Azena pordego (lat. *Porta Asinaria*) apartenas al la Aŭrelia Murego, konstruita en la jaroj 271–275 p.K., do 2 jarcentojn post Nerono.

<sup>291</sup> Latine *nymphæ Libethrides* — unu el la nomoj de la muzoj, rilata al la fonto Libetro (gr. Λιβηθρις) en Tracujo.

kulpo senkulpulojn!»

La vortoj de Petronio forte impresadis ordinare Nerono, sed ĉi-foje Petronio mem ne faris al si iluziojn, ĉar li komprenis, ke tio, kion li diras, estas la lasta rimedo, kiu povas, vere, en favora okazo savi la kristanojn, sed ankoraŭ pli certe povas pereigi lin mem. Li ne hezitis tamen, ĉar li faris ĝin por Vinicio, kiun li amis, kaj por la hazardo, per kiu li ludis. «La kuboĵ estas ĵetitaj», li diris al si, «kaj mi vidos, kiom la timo pri la propra kapo superos en la simio la gloramonojn.»

Kaj en la animo li ne dubis, ke tamen superos la timo.

Dume post liaj vortoj sekvis silento. Popea kaj ĉiuj ĉeestantoj rigardis, kiel sorĉan bildon, la okulojn de Nerono; tiu komencis levi la lipojn supren, proksimigante ilin ĝis la nazo, kiel li kutimis fari, se li ne sciis, kion decidi; fine embarasiteco kaj tedo speguliĝis evidente sur lia vizaĝo.

— Sinjoro, — ekparolis Tigeleno, vidante tion, — permesu al mi foriri, ĉar kiam oni volas elmeti al pereoj cian personon, kaj krome nomas ĉin malgrandanima imperiestro, malgrandanima poeto, brulmetinto kaj komediisto, miaj oreloj ne povas elporti tiajn vortojn.

«Mi malgajnis», ekpensis Petronio.

Tamen, turninte sin al Tigeleno, li ĵetis al li rigardon, en kiu estis malrespekto de granda sinjoro kaj eleganta

homo al mizerulo, poste li diris:

— Cin, Tigeleno, mi nomis komediisto, ĉar ci ludas komedion eĉ nun.

— Ĉu per tio, ke mi ne volas aŭskulti ciajn insultojn?

— Per tio, ke ci ŝajnigas senliman amon al Cezaro, kaj antaŭ momento ci minacis lin per la pretorianoj, kion komprenis ni ĉiuj kaj li ankaŭ.

Tigeleno, kiu ne supozis, ke Petronio kuraĝos ĵeti sur la tablon similajn kubojn, perdis la kapon kaj mutiĝis. Sed ĝi estis la lasta venko de la arbitro de eleganteco kontraŭ la rivalo, ĉar en la sama momento Popea diris:

— Sinjoro, kiel ci povas permesi, ke tia penso trairu eĉ ies kapon, kaj tiom pli, ke iu kuraĝu eldiri ĝin laŭte en cia ĉeesto!

— Punu la insultulon! — ekkriis Vitelio.

Nerono levis denove la lipojn ĝis la nazo kaj, turninte al Petronio siajn vitrosimilajn okulojn de miopulo, diris:

— Tiel ci repagas al mi la amikecon, kiun mi havis al ci?

— Se mi eraras, pruvu tion al mi, — respondis Petronio, — sciu tamen, ke mi diras, kion al mi ordonas mia amo al ci.

— Punu la insultulon! — ripetis Vitelio.

— Faru ĝin! — aŭdiĝis kelkaj voĉoj.

En la atrio iĝis brueto kaj movado, ĉar la homoj komencis forŝovi sin de Petronio. Forŝoviĝis eĉ Tulio Seneciono, lia konstanta kunulo en la kortego, kaj la juna Nerovo, kiu ĝis tiam elmontradis al li plej vivan amikecon. Post momento Petronio restis sola en la maldekstra parto de la atrio kaj kun rideto sur la lipoj, disŝovante per la mano la faldojn de sia togo, atendis ankoraŭ, kion diros aŭ faros Nerono.

Kaj Nerono diris:

— Vi volas, ke mi lin punu, sed li estas mia kunulo kaj amiko, do, kvankam li vundis mian koron, li sciu, ke tiu ĉi koro havas por amikoj nur ... pardonon.

«Mi malgajnis kaj pereis», ekpensis Petronio.

Dume la imperiestro leviĝis, la interkonsilo estis finita.



## Ĉapitro 50<sup>a</sup>

Petronio revenis hejmen, kaj Nerono kun Tigeleno trairis en la atrion de Popea, kie ilin atendis la homoj, kun kiuj la prefekto antaŭe parolis.

Estis tie du rabenoj el Transtibero, vestitaj per longaj, solenaj vestoj, kun mitroj sur la kapoj, juna skribisto, ilia helpanto, kaj Ĥilono. Ĉe la vido de la imperiestro la pastroj paliĝis pro emocio kaj, levinte la manojn al la nivelo de la ŝultroj, klinis ĝis ili la kapojn.

— Saluton al ci, monarĥo de monarĥoj kaj reĝo de reĝoj, — diris la pli aĝa. — Saluton al ci, reganto de la tero, zorganto de la elektita popolo kaj imperiestro, leono inter la homoj, kies regado estas kiel la suna lumo kaj kiel libana cedro kaj kiel palmo kaj kiel jeriĥa balzamo!...

— Vi ne nomas min dio? — demandis Nerono.

La pastroj paliĝis ankoraŭ pli multe; la pli aĝa denove ekparolis:

— Ciam vortoj, sinjoro, estas dolĉaj, kiel la frukto de vinberujo kaj kiel matura figo, ĉar Jehovo plenigis cian koron per boneco. Sed la antaŭinto de cia patro, imperiestro Gajo<sup>292</sup>, estis kruela, tamen niaj senditoj ne nomis lin dio, preferante la morton mem ol ofendon de la Leĝo.

<sup>292</sup> T.e. Gajo Kaligulo (lat. *C. Caligula*).

— Ĉu Kaligulo ordonis ĵeti ilin al leonoj?

— Ne, sinjoro. Imperiestro Gajo ektimis la koleron de Jehovo.

Kaj ili levis la kapojn, ĉar la nomo de la potenca Jehovo inspiris al ili kuraĝon. Fidante lian forton, pli sentime ili rigardis jam en la okulojn de Nerono.

— Ĉu vi akuzas la kristanojn pri la bruligo de Romo? — demandis Nerono.

— Ni, sinjoro, akuzas ilin nur, ke ili estas malamikoj de la Leĝoj, malamikoj de la homa gento, malamikoj de Romo kaj de ci, Cezaro, kaj ke delonge ili minacis la urbon kaj la mondon per fajro. La reston diros al ci tiu ĉi homo, kies buŝo ne makuliĝos per mensogo, ĉar en la vejnoj de lia patrino fluis la sango de la elektita popolo.

Nerono sin turnis al Ĥilono.

— Kiu ci estas?

— Cia adoranto, ho Oziriso, kaj krome malriĉa stoikisto.

— Mi malamas la stoikistojn, — diris Nerono, — mi malamas Trazeon, mi malamas Muzonion kaj Kornuton. Abomenaj estas al mi iliaj paroloj, ilia malestimo al arto, ilia memvola mizero kaj malpuremo.

— Sinjoro, cia majstro, Seneko, havas mil citronligajn tablojn. Volu nur, kaj mi havos da ili duoblan nom-

bron. Mi estas stoikisto pro neceso. Vestu, ho Brilradia, mian stoikecon per rozkrono, starigu antaŭ ĝi kruĉon da vino, kaj mi kantos Anakreonton tiel, ke mi superkrios ĉiujn epikuranojn.

Nerono, al kiu ekplaĉis la epiteto «Brilradia», ridetis kaj diris:

— Ci plaĉas al mi.

— Tiu ĉi homo meritas tiom da oro, kiom li pezas, — ekkriis Tigeleno.

Kaj Ĥilono respondis:

— Kompletigu, sinjoro, mian pezon per cia malavar-eco, alie la vento forportos la pagon.

— Vere, ci ne superpezus Vitelion, — intermetis Nerono.

— Ho ve! Dia majstro de l' Arĝenta Pafarko<sup>293</sup>, mia sprito ne estas el plumbo.

— Mi vidas, ke ciaj Leĝoj ne malpermesas al ci nomi min dio?

— Ho senmorta! Miaj Leĝoj estas en ci: la kristanoj blasfemis kontraŭ tiuj Leĝoj, kaj tial mi ilin malamas.

— Kion ci scias pri la kristanoj?

— Ĉu ci permesas al mi plori, dia?

— Ne, — diris Nerono, — tio min enuigas.

<sup>293</sup> T.e. «Apolono», kies tradicia nomepiteto estas ἀργυρότοξος (arĝentpa-farka).

— Kaj trioble ci pravas, ĉar la okuloj, kiuj cin vidis, devas por ĉiam sekiĝi de larmoj. Sinjoro, gardu min kontraŭ miaj malamikoj.

— Parolu pri la kristanoj, — diris Popea kun ioma malpacienco.

— Okazos, kiel ci ordonas, Izido, — respondis Ĥilono. — Jen de mia juneco mi dediĉis min al la filozofio kaj mi serĉis la veron. Mi serĉis ĝin ĉe la iamaj diaj saĝuloj, kaj en la Akademio en Ateno, kaj en la aleksandria Serapejo. Ekaŭdinte pri la kristanoj, mi supozis, ke tio estas ia nova skolo, kie mi povos trovi kelkajn grajnojn de vero, kaj mi konatiĝis kun ili, je mia malfeliĉo! La unua kristano, kun kiu min renkontigis la malbona sorto, estis Glaŭko, kuracisto el Neapolo. De li mi eksciis poste, ke ili adoras iun Ĥreston, kiu promesis al ili ekstermi ĉiujn homojn, detruiri ĉiujn urbojn sur la tero, kaj ilin lasi, se ili helpas al li ekstermi la idojn de Deŭkaliono. Tial, ho sinjoro, ili malamas la homojn, tial ili venenas fontanojn, tial en siaj kunvenoj ili malavaras malbenojn al Romo kaj al ĉiuj temploj, kie glorataj estas niaj dioj. Ĥresto estis krucumita, sed li promesis al ili, ke kiam Romo estos detruita per fajro, li venos duafoje en la mondon kaj donos al ili la regadon de la tero...

— Nun la popolo komprenos, kial Romo estas brulig-

ita, — interrompis Tigeleno.

— Multaj jam komprenas, sinjoro, — respondis Ĥilono, — ĉar mi iradas en la ĝardenoj, sur la Kampo de Marso kaj instruas. Sed se vi bonvolos aŭskulti min ĝis la fino, vi komprenos, kiajn motivojn de venĝo mi havas. Glaŭko la kuracisto komence ne malkaŝis al mi, ke ilia instruo ordonas malamon al la homoj. Kontraŭe! Li diradis al mi, ke Ĥresto estas bona dio kaj ke la fundamento de lia instruo estas amo. Mia amema koro ne povis kontraŭstari tiajn verojn, do mi ekamis Glaŭkon kaj ekfidis al li. Mi dividis kun li ĉiun pecon da pano, ĉiun groŝon, kaj ĉu ci scias, sinjoro, kiel li repagis al mi? Envoje el Neapolo al Romo li frapis min per ponardo, kaj mian edzinon, belan kaj junan Berenikon, vendis al sklavkomercistoj. Se Sofoklo konus mian sorton ... sed kion mi diras! Aŭskultas min iu pli bona ol Sofoklo.

— Kompatinda homo! — diris Popea.

— Kiu vidis la vizaĝon de Afrodito, ne estas kompatinda, sinjorino, kaj mi ĝin vidas ĉi-momente. Sed tiam mi serĉis konsolon en la filozofio. Veninte Romon, mi penis atingi la kristanajn ĉefulojn por ricevi justecon kontraŭ Glaŭko. Mi kredis, ke ili devigos lin redoni al mi la edzinon ... Mi ekkonis ilian ĉefpastron, mi ekkonis alian, nomatan Paŭlo, kiu estis ĉi tie tenata en malliberejo, sed poste

liberigita, mi ekkonis la filon de Zebedeo, mi ekkonis Linon kaj Kleton kaj multajn aliajn. Mi scias, kie ili loĝis antaŭ la brulo, mi scias, kie ili kunvenas, mi povas montri unu subterejon en la Vatikana monteto kaj unu tombejon ekster la Nomentana pordego, kie ili plenumas siajn malnoblajn ritojn. Mi vidis tie Petron la apostolon, mi vidis Glaŭkon, kiu murdis infanojn, por ke la apostolo povu ŝprucigi ilian sangon sur la kapojn de la ĉeestantoj, kaj mi vidis Ligian, la zorgatinon de Pomponia Grecina, kiu fanfaronis, ke ne povante alporti infanan sangon, ŝi tamen alportas morton de infano, ĉar ŝi mortsorĉis cian filinon, ho Oziriso, kaj cian, ho Izido!

— Aŭskultu, Cezaro! — diris Popea.

— Ĉu povas esti? — ekkriis Nerono.

— Mi povis pardoni la malbonojn al mi faritajn, — daŭrigis Ĥilono, — sed ekaŭdinte pri la farita al vi, mi volis frapi ŝin per ponardo. Bedaŭrinde malhelpis min la nobla Vinicio, kiu ŝin amas.

— Vinicio? Ŝi ja forkuris de li?

— Ŝi forkuris, sed li serĉis ŝin, ĉar li ne povis vivi sen ŝi. Por mizera pago mi helpis lian serĉadon kaj mi montris al li la domon en Transtibero, kie ŝi loĝis meze de kristanoj. Ni iris tien kune, kaj kun ni ankaŭ cia luktisto, Krotono, kiun la nobla Vinicio dungis por sia defendo. Sed Ur-

so, sklavo de Ligia, sufokis Krotonon. Terure forta homo li estas, sinjoro; al virbovoj li rompas la nukojn tiel facile, kvazaŭ iu derompus papavajn kapetojn. Aŭlo kaj Pomponia amis lin pro tio.

— Je Herkulo! — diris Nerono, — la mortemulo, kiu sufokis Krotonon, indas monumenton sur Forumo. Sed ci eraras aŭ mensogas, maljunulo, ĉar Krotonon mortigis per ponardo Vinicio.

— Jen, kiel homoj trompas diojn. Ho sinjoro, mi mem vidis, kiel Urso rompis la ripojn de Krotono kaj kiel poste li faligis Vinicion. Li mortigus la tribunuson, se Ligia lin ne malhelpus. Vinicio malsanis poste dum longa tempo, sed ili flegis lin, esperante, ke pro amo li iĝos kristano. Kaj li iĝis efektive kristano.

— Vinicio?

— Jes.

— Ĉu eble ankaŭ Petronio? — demandis avide Tigeleno.

Ĥilono komencis tordi sin, froti la manojn kaj diris:

— Mi admiras cian penetremon, sinjoro! Ho!... povas esti! Tre povas esti!

— Nun mi komprenas, kial li tiel defendis la kristanojn.

Sed Nerono ekridis.

— Petronio kristano!... Petronio malamiko de la vivo kaj de voluptoj! Ne estu malsaĝuloj kaj ne volu, ke mi tion kredu, aŭ mi estas preta nenion kredi.

— Sed la nobla Vinicio iĝis kristano, sinjoro. Mi ĵuras je tiu ĉi brilo, kiu de ci radias, ke mi diras la veron kaj ke nenio inspiras al mi tian abomenon, kiel mensogo. Pomponia estas kristanino, la malgranda Aŭlo estas kristano, kaj Ligia, kaj Vinicio. Mi servis lin fidele, kaj li repage, laŭ la deziro de Glaŭko la kuracisto, ordonis, kvankam mi estas maljuna, skurĝi min, kaj mi estis tiam malsana kaj malsata. Kaj mi ĵuris je Hadeso, ke mi tion pri li memoros. Ho sinjoro, venĝu la malbonon, kiun oni al mi faris, kaj mi transdonos al vi Petron la apostolon kaj Linon kaj Kleton kaj Glaŭkon kaj Krispon, ĉiujn ĉefulojn, kaj Ligian kaj Urson, mi montros al vi centojn kaj milojn da ili, mi montros preĝodomojn, tombejojn; en ĉiuj viaj malliberejoj malsufiĉos por ili loko!... Sen mi vi ne scius ilin trovi. Ĝis hodiaŭ mi, mizerulo, serĉis konsolon en la filozofio, nun mi trovu ĝin en la favoroj, kiuj venos sur min ... Mi estas maljuna kaj ne spertis la ĉarmon de la vivo, — mi ripozu!...

— Ci volas esti stoikisto antaŭ plena manĝujo.

— Kiu faras servon al ci, samfakte ĝin plenigas.

— Ci ne eraras, filozofe.



Sed Popea ne ĉesis pensi pri siaj malamikoj. Ŝia plaĉo je Vinicio estis, pli ĝuste, momenta ekdeziro, naskita sub la influo de ĵaluzo, kolero kaj ofendita memamo. Tamen la malvarmo de la juna patricio tuŝis ŝin profunde kaj plenigis ŝian koron per senpardona ofendosento. La fakto mem, ke li kuraĝis preferi alian virinon ol ŝin, ŝajnis al ŝi krimo, vokanta venĝon. Koncerne Ligian, ŝi malamis ŝin de la unua momento, en kiu ŝin maltrankviligis la beleco de tiu norda lilio. Petronio, kiu parolis pri ŝiaj tro mallarĝaj koksoj, povis sugestii, kion li volis, al Nerono, sed ne al la aŭgustino. La sperta Popea de la unua rigardo ekkomprenis, ke en la tuta Romo Ligia sola povas kun ŝi konkuri, kaj eĉ venki ŝin. Kaj de tiu momento ŝi ĵuris al la knabino pereon.

— Sinjoro, — ŝi diris, — venĝu nian infanon!

— Rapidu! — ekkriis Ĥilono, — rapidu! Alie Vinicio kaŝos ŝin. Mi montros la domon, kien ili revenis post la brulo.

— Mi donos al ci dek soldatojn kaj iru tuj, — diris Tigeleno.

— Sinjoro! Ci ne vidis Krotonon en la manoj de Urso; se ci donos al mi kvindek soldatojn, mi montros nur de malproksime la domon. Sed se vi ne malliberigos samtempe Vinicion, mi pereos.

Tigeleno rigardis Neronon.

— Ĉu ne estus bone, ho dia, fini kune kun la onklo kaj kun la nevo?

Nerono ekpensis momente kaj diris:

— Ne! Ne nun!... La homoj ne kredus, se oni volus ilin konvinki, ke Petronio, Vinicio aŭ Pomponia Grecina bruligis Romon. Tro belajn domojn ili havis ... Hodiaŭ aliaj viktimoj estas bezonaj, kaj ilia vico venos poste.

— Donu do al mi soldatojn, por ke ili min gardu, — diris Ĥilono.

— Tigeleno prizorgos tion.

— Ci loĝos dume ĉe mi, — diris la prefekto.

Ĥojo ekradiis el la vizaĝo de Ĥilono.

— Mi transdonos ĉiujn! Rapidu nur! Rapidu! — li ekkriadis per raŭka voĉo.

## Ĉapitro 51<sup>a</sup>

Petronio, elirinte el la palaco, ordonis porti sin al sia domo ĉe Karinoj, kiu, ĉirkaŭite triflanke per ĝardeno kaj havante antaŭe la malgrandan Forumon Cecilian, escepte evitis pereon en la brulo.

Pro tio la aliaj aŭgustanoj, kiuj perdis siajn domojn, kaj en ili kune multegajn riĉaĵojn kaj artverkojn, nomis Petronion feliĉulo. Cetere oni delonge parolis pri li, ke li estas favorata filo de Fortuno, kaj la ĉiam kreskanta amikeco, kiun elmontradis al li Nerono, ŝajnis konfirmi tiun opinion.

Sed tiu favorata filo povis nun mediti nur eble pri la ŝanĝemo de tiu patrino, aŭ pli ĝuste pri ŝia simileco al Kronoso, formanĝanta la proprajn infanojn.

«Se mia domo estus forbrulinta», li parolis al si, «kaj kune miaj gemoj, miaj etrusiaj vazoj kaj aleksandriaj vitraĵoj kaj Korintaj kupraĵoj, eble Nerono efektive forgesus la ofendon. Je Polukso! Mi nur pensu, ke nur de mi dependis esti ĉi-momente prefekto de la pretorianoj. Mi deklarus Tigelenon la bruliginto, kiu li cetere estas, mi vestus lin per „dolora tuniko“, transdonus al la popolo, mi sekurigus la kristanojn kaj rekonstruus Romon. Kiu scias eĉ, ĉu honestuloj ne prosperus de tiam pli bone. Mi devis

tion fari, eĉ nur pro Vinicio. En la okazo de troa laboro mi cedus al li la prefektan oficon kaj Nerono eĉ ne provus kontraŭstari ... Poste Vinicio, se plaĉus al li, kristanigu ĉiujn pretorianojn kaj eĉ la imperiestron mem, tio ja ne niel min ĝenus! Nerono pia, Nerono virta kaj kompatema, — ĝi estus eĉ amuza spektaklo.»

Kaj lia senzorgemo estis tiel granda, ke li komencis rideti. Sed post momento lia penso direktiĝis aliflanken. Ŝajnis al li, ke li estas en Ancio kaj ke Paŭlo el Tarso parolas al li:

«Ci nomas nin malamikoj de la vivo, sed respondu al mi, Petronio: se la imperiestro estus kristano kaj agus laŭ nia instruo, ĉu tiam via vivo ne estus pli sekura kaj pli sendanĝera?»

Kaj, rememorinte tiujn ĉi vortojn, li parolis al si plu:

«Je Kastoro! Kiom da kristanoj oni murdos ĉi tie, tiom da novaj Paŭlo trovos, ĉar, se la mondo ne povas sin bazi sur kanajleco, tiam li pravas ... Sed kiu scias ĉu ĝi ne povas, se ĝi ja sin bazas sur io. Mi mem, kiu lernis ne mal multe, ne ellernis, kiel esti sufiĉe granda kanajlo, kaj tial mi devos fine distranĉi miajn vejnojn ... Sed tia devus ja esti la fino, kaj se ĝi eĉ ne estus tia, ĝi estus alia. Mi bedaŭras mian Eŭnikon kaj mian vazon el Murho, sed Eŭniko estas libera, kaj la vazo iros kun mi ... Ahenobarbo ri-

cevos ĝin en neniuj okazoj! Mi bedaŭras ankaŭ Vinicion. Cetere, kvankam mi malpli enuis en la lasta tempo ol antaŭe, mi estas preta. En la mondo estas belo, sed la homoj pliparte estas tiel fiaj, ke ne valoras bedaŭri la vivon. Kiu sciis vivi, devas scii morti. Kvankam mi apartenis al la aŭgustanoj, mi estis homo pli libera ol ili supozas.»

Ĉe tio li movis la ŝultrojn.

«Ili eble pensas tie, ke ĉi-momente tremas miaj genuoj kaj timo hirtigas la harojn sur mia kapo, dume mi, reveninte hejmen, banos min en viola akvo, poste mia orharulino mem ŝmiros min kaj post la manĝo ni ordonos kanti al ni plurvoĉe tiun himnon al Apolono, kiun komponis Antemio. Mi mem diris iam: „Ne valoras pensi pri la morto, ĉar ĝi mem pensas pri ni, sen nia helpo“. Admirinde tamen estus, se efektive ekzistus iaj Elizeaj kampoj, kaj sur ili la ombroj ... Eŭniko venus iam al mi kaj ni vagadus kune sur herbejoj, kovritaj de asfodeloj. Mi ankaŭ trovas societon pli bonan ol ĉi tie ... Kiaj arlekenoj! Kiaj artifikistoj, kia plebo abomena, sen gusto kaj poluro! Dek arbitroj de eleganteco ne ŝanĝus tiujn Trimalĥionojn en decajn homojn. Je Persefono! Mi havas ilin sufiĉe!»

Kaj li rimarkis kun miro, ke jam io dividis lin de tiuj homoj. Li konis ja ilin bone kaj sciis antaŭe, kion pensi pri ili, nun tamen ili ekŝajnis al li pli malproksimaj kaj pli

malestimindaj ol ordinare. Vere li havis ilin sufiĉe.

Sed poste li komencis konsideri sian situacion. Dank' al sia penetremo li komprenis, ke la pereco ne tuj lin minacas. Nerono profitis ja la konvenan momenton por eldiri kelkajn belajn, noblajn vortojn pri amikeco, pri pardono, kaj certagrade ligis per ili siajn manojn. Li devos nun serĉi pretekston, kaj antaŭ ol li ĝin trovos, povas pasi multe da tempo.

«Antaŭ ĉio li aranĝos cirkludon kun kristanoj, — parolis al si Petronio, — nur poste li ekpensos pri mi, kaj se tiel estas, ne valoras fari al si zorgojn, nek ŝanĝi la vivmanieron. Pli proksima danĝero minacas Vinicion.»

Kaj de tiu ĉi momento li pensis jam sole pri Vinicio, kiun li decidis savi.

La sklavoj portis rapide la portilon meze de ruinoj, cindramasoj kaj kamentuboj, de kiuj ankoraŭ plenis Karioj, sed li ordonis al ili kuri tutforte por atingi plej baldaŭ la hejmon. Vinicio, kies palaceto forbrulis, loĝis ĉe li kaj feliĉe estis hejme.

— Ĉu ci vidis hodiaŭ Ligian? — demandis Petronio, enirante.

— Mi ĵus revenis de ŝi.

— Aŭskultu, kion mi diros, kaj ne perdu la tempon por demandoj. Oni decidis hodiaŭ ĉe la imperiestro atribui al

la kristanoj la bruligon de Romo. Minacas ilin persekutado kaj torturoj. Oni ilin ekĉasos en plej proksimaj momentoj. Prenu Ligian kaj forkuru senprokraste, eĉ trans Alpoj aŭ en Afrikon. Kaj rapide, ĉar de Palatino pli proksime estas al Transtibero ol de ĉi tie!

Vinicio estis efektive tro bona soldato por perdi la tempon por superflujaj demandoj. Li aŭskultis kun brovoj kuntiritaj, kun vizaĝo atenta kaj severa, sed sen teruro. Evidente la unua sento, kiu vekigadis en lia naturo kontraŭ danĝero, estis la preteco al batalo kaj kontraŭstaro.

— Mi iras, — li diris.

— Unu vorton pli: prenu sakon da oro, prenu armilon kaj aron da ciaz sklavoj-kristanoj. Se bezone — forkaptu ŝin atake!

Vinicio jam estis en la pordo de la atrio.

— Sendu al mi sciigon per sklavo, — postkriis Petronio al la foriranto.

Kaj, restinte sola, li komencis paŝi laŭlonge de la kolojoj, ornamantaj la atrion, pensante pri tio, kio okazos. Li sciis, ke Ligia kaj Lino revenis jam post la brulo en sian antaŭan loĝejon, kiu, same kiel pliparto de Transtibero, evitis pereon, kaj tio estis malfavora cirkonstanco, ĉar alie ne estus facile trovi ilin en la amasoj. Li esperis tamen, ke neniu scias sur Palatino, kie ili loĝas, kaj sekve ke Vinicio

antaŭos la pretorianojn. Venis al li ankaŭ la ideo, ke Tigeleno, volante elĉasi unufoje kiel eble plej multajn kristanojn, devas streĉi la reton tra la tuta Romo, tio estas dividi la pretorianojn en malgrandajn grupojn. Se oni sendos ne pli ol dek homojn por ŝin kapti, — li pensis, — la ligia titano mem rompos al ili la ostojn, kiom do pli certe, se helpos lin Vinicio. Kaj pensante pri tio, li rekuraĝiĝis. Kontraŭstari armite la pretorianojn signifis, vere, preskaŭ la samon, kiel komenci militon kontraŭ la imperiestro. Petronio sciis ankaŭ, ke se Vinicio savos sin de la venĝo de Nerono, tiu venĝo povos fali sur lin, sed li nemulte zorgis pri tio. Kontraŭe, la penso, ke li konfuzos la planojn al Nerono kaj Tigeleno, gajigis lin. Li decidis avari por tio nek monon, nek homojn, kaj ĉar Paŭlo el Tarso konvertis jam en Ancio plimulton da liaj sklavoĵ, li povis esti certa, ke en la defendo de kristanino li povas fidi ilian pretecon kaj oferemon.

La eniro de Eŭniko interrompis lian meditado. Je ŝia vido ĉiuj liaj embarasoj kaj zorgoj malaperis for. Li forĝesis Neronon, la malfavoron, kiu lin trafis, la malnoblajn aŭgustanojn, la persekutadon, minacantan al la kristanoj, Vinicion kaj Ligian, kaj rigardis sole ŝin per okuloj de estetikulo, kiu adoras belan formon, kaj de amanto, al kiu el tiu formo spiras amo. Ŝi, vestita per travidebla *Coa vestis*,



<sup>294</sup> el sub kiu trabrilis ŝia roza korpo, estis efektive belega, kiel diino. Sentante sin krom tio adorata kaj amante lin per la tuta animo, ĉiam avida je liaj karesoj, ŝi komencis flami de ĝojo, kvazaŭ ne konkubino ŝi estus, sed senkulpa knabino.

— Kion ci diros, ĥarito? — demandis Petronio, etendante al ŝi la brakojn.

Kaj ŝi, klinante al li sian oran kapon, respondis:

— Sinjoro, venis Antemio kun kantistoj kaj demandas, ĉu ci volos aŭskulti lin hodiaŭ?

— Li atendu. Li kantos al ni dum la tagmanĝo sian himnon al Apolono. Ĉirkaŭe estas ankoraŭ ruinoj kaj cindroj, kaj ni aŭskultos himnon al Apolono! Je la boskoj de Pafoso! Kiam mi vidas cin en tiu ĉi *Coa vestis*, ŝajnas al mi, ke Afrodito vualis sin per ĉielteksaĵo kaj staras antaŭ mi.

— Ho sinjoro! — diris Eŭniko.

— Venu ĉi tien, Eŭniko, metu la brakojn ĉirkaŭ mian kolon kaj donu al mi cian buŝon... Ĉu ci min amas?

— Mi ne pli amus Zeŭson.

Dirinte ĉi tion, ŝi alpremis la buŝon al lia buŝo, tremante pro feliĉo en liaj brakoj.

Sed post momento Petronio diris:

<sup>294</sup> *Coa vestis* [koa vestis] (lat.) — vesto el insulo Koso (greke Κως), preskaŭ travidebla vesto neĉasta.

— Kaj se ni devus disiĝi?

Eŭniko rigardis kun subita timo en liajn okulojn:

— Kion ci diras, sinjoro?...

— Ne timu!... Ĉar vidu, kiu scias, ĉu mi ne devos iri malproksiman vojaĝon...

— Kunprenu min...

Sed Petronio ŝanĝis subite la temon de la interparolo kaj demandis:

— Diru al mi, ĉu sur la ĝardenaj herbejoj estas asfodeloj?

— En la ĝardeno la cipresoj kaj la herbejoj flaviĝis de la brulo, forfalis la folioj de la mirtoj kaj la tuta ĝardeno aspektas kvazaŭ mortinta.

— La tuta Romo aspektas kvazaŭ mortinta, kaj baldaŭ ĝi estos vera tombejo. Ĉu ci scias, ke estas eldonota edikto kontraŭ la kristanoj kaj komenciĝos persekutado, dum kiu pereos miloj da homoj?

— Pro kio oni ilin punos, sinjoro? Ili estas homoj bonaj kaj trankvilaj.

— Ĝuste pro tio.

— Ni do veturu marborden. Ciaj diaj okuloj ne ŝatas rigardi sangon.

— Bone, sed dume mi devas bani min. Venu en la oleadejon ŝmiri miajn brakojn. Je la zono de Kipridino! An-

koraŭ neniam ci ŝajnis al mi tiel belega. Mi ordonos fari por ci bankuvon en la formo de konko, kaj ci estos en ĝi, kiel multekosta perlo ... Venu, Orhara.

Li foriris, kaj horon poste kun rozkronoj sur la kapoj, kun nebulvualitaj okuloj ili kuŝiĝis antaŭ tablo kovrita per oraj manĝiloj. Servis ilin knabetoj alivestitaj kiel amoroj kaj ili, trinkante glutojn da vino el pokaloj, ĉirkaŭvolvitaj per hedero, aŭskultis himnon al Apolono, kantatan ĉe la sono de harpoj sub la direkto de Antemio. Kion povis por ili signifi, ke ĉirkaŭ la vilao sin etendis supren el ruinoj kamentuboj de domoj, ke ventblovoj disportadis la cindrojn de Romo. Ili sentis sin feliĉaj kaj pensis nur pri la amo, kiu ŝanĝadis ilian vivon kvazaŭ en dian sonĝon.

Sed, antaŭ ol la himno estis finita, eniris en la manĝejon la atriestro.

— Sinjoro, — diris li per voĉo, en kiu vibris maltrankvilo, — centuriestro kun taĉmento da pretorianoj staras antaŭ la pordego kaj laŭ ordono de la imperiestro deziras paroli kun ci.

La kantado kaj la sonoj de la harpoj ĉesis. Maltrankvilo ekposedis ĉiujn ĉeestantojn, ĉar Nerono en la rilatoj kun siaj amikoj ne uzis ordinare pretorianojn kaj ilia alveno en tiu tempo anoncis nenion bonan. Petronio sola ne elmontris eĉ plej etan emocion kaj diris, kiel parolas

homo tedata de senĉesaj alvokoj:

— Oni povus lasi min trankvile tagmanĝi.

Poste li sin turnis al la atriestro:

— Li eniru.

La sklavo malaperis post la kurteno; momenton poste aŭdiĝis pezaj paŝoj kaj en la triklinion eniris centestro Aper, konata al Petronio, komplete armita, kun fera kasko sur la kapo.

— Nobla sinjoro, — li diris, — jen letero de la imperiestro.

Petronio etendis maldiligente sian blankan manon, prenis la tabuletojn kaj, ĵetinte al ili rigardon, transdonis ilin kun plena trankvilo al Eŭniko.

— La imperiestro legos hodiaŭ vespere novan kanton el *Troica*, — li diris, — kaj invitas min, ke mi venu.

— Estas al mi ordonite nur transdoni la leteron, — diris la centestro.

— Jes. Ne estos respondo. Sed eble ci, centestro, sidiĝos kun ni por momento kaj trinkos pokalon da vino?

— Dankon al ci, nobla sinjoro. Pokalon da vino mi volonte trinkos je cia sano, sed sidiĝi mi ne povas, ĉar mi estas en servo.

— Kial oni transdonis la leteron al ci, anstataŭ sendi ĝin pere de sklavo?

— Mi ne scias, sinjoro. Eble tial, ke oni min sendis sandirekten en alia afero.

— Mi scias, — diris Petronio, — kontraŭ la kristanoj.

— Jes, sinjoro.

— Ĉu oni komencis la kaptadon antaŭ longe?

— Kelkajn taĉmentojn oni sendis Transtiberon jam antaŭ la tagmezo.

Dirinte ĉi tion, la centuriestro verŝis el la pokalo iom da vino honore al Marso, poste eltrinkis ĝin kaj diris:

— Donu al ci la dioj, kion ci volas, sinjoro.

— Prenu ankaŭ tiun ĉi pokalon, — diris Petronio.

Poste li donis signon al Antemio, ke li finu la himnon al Apolono.

«La Kuprobarba komencas mokludi kun mi kaj kun Vinicio», li diris al si mem, kiam la harpoj eksonis denove. «Mi divenas lian intencon! Li volis min teruri, sendante la inviton per centuriestro. Oni demandos vespere la centestron, kiel mi lin akceptis. Ne, ci ne ĝojos tro multe, malica kaj kruela pupaĉo. Mi scias, ke la ofendon ci ne forgesos, ke mi ne evitos pereon, se ci tamen pensas, ke mi rigardos petege en ciajn okulojn, ke ci vidos sur mia vizaĝo timon kaj humilecon, ci eraras.»

— La imperiestro skribas: «Venu, se ci deziras», — diris Eŭniko, — ĉu ci iros?

— Mi estas en bonega humoro kaj mi povas aŭskulti ĉe liajn versaĵojn, do mi iros, tiom pli, ke Vinicio ne povas iri.

Efektive, post la tagmanĝo kaj post la ordinara promeno li konfidis sin en la manojn de sklavinoj frizantaj la harojn, kaj de sklavinoj ondigantaj la faldojn. Horon poste, bela, kiel dio, li ordonis porti sin sur Palatinon. La horo estis malfrua, la vespero varma, la luno brilis tiel lumme, ke la torĉistoj, irantaj antaŭ la portilo, estingis la torĉojn. Sur la stratoj kaj meze de la rubamasoj vagis aroj da homoj duonebriaĵoj de vino, vestitaj per hedero kaj lonice-ro, portantaj en la manoj branĉetojn de mirto kaj laŭro, kiujn al ili havigis la imperiestraj ĝardenoj. Abundo da greno kaj espero de cirkoludoj plenigis per ĝojo la homajn korojn. Kelkloke oni kantis kantojn, glorantajn la «dian nokton» kaj amon; kelkloke oni dancis ĉe la lunlumo; kelkfoje la sklavoj devis voki pri loko por la portilo de la «nobla Petronio», kaj tiam la amaso disŝovadis sin, voĉante ekkriojn honore al sia favorato.

Li dume pensis pri Vinicio kaj miris, ke li ricevis de li nenian sciigon. Li estis epikurano kaj egoisto, tamen, rilatante jen kun Paŭlo el Tarso, jen kun Vinicio, kaj aŭdante ĉiutage pri la kristanoj, li iom aliigis, kvankam li mem tion ne sciis. Blovis al li de ili ia vento, kiu ĵetis en lian

animon nekonatajn semojn. Ekster la propra persono komencis lin interesi aliaj homoj, al Vinicio li havis cetere ĉiam amon, ĉar ankoraŭ en sia infaneco li tre amis lian patrinon, sian fratinton; kaj nun, preninte parton en liaj aferoj, li rigardis ilin kun tia intereso, kvazaŭ li rigardus lian tragedion.

Li ne perdis la esperon, ke Vinicio antaŭvenis la pretorianojn kaj forkuris kun Ligia, aŭ eventuale, ke li rekapitis ŝin atake. Sed li preferus havi certecon, ĉar li antaŭvidis, ke eble li devos respondi diversajn demandojn, al kiuj li preferus esti preparita.

Haltinte antaŭ la domo de Tiberio, li eliris el la portilo kaj post momento eniris en la atrion, jam plenan je aŭgustanoj. La hieraŭaj amikoj, kvankam mirigis ilin, ke li estis invitita, forŝovadis sin ankoraŭ de li, sed li paŝis meze de ili, belega, en maniero facila, senzorga kaj kun tia certeeco, kvazaŭ li mem povus disponi favorojn. Kelkaj do, vidante lin, maltrankviliĝis en la animo, ĉu ne estis tro frue elmontri al li indiferentecon.

Nerono ŝajnis tamen, ke li ne vidas Petronion kaj ne respondis al lia saluto, ŝajnigante sin okupita per interparolo. Aliflanke proksimiĝis al li Tigeleno kaj diris:

— Bonan vesperon, arbitro de eleganteco. Ĉu ĉiam ankoraŭ ci asertas, ke ne la kristanoj bruligis Romon?

Petronio movis la ŝultrojn kaj, frapetante lin sur la skapolon, kiel liberigiton, respondis:

- Ci scias same bone, kiel mi, kion opinii pri tio.
- Mi ne kuraĝas kompari min kun cia saĝeco.
- Kaj ci estas parte prava, ĉar en tiu okazo, kiam Cezaro legos nun al ni novan kanton el *Troica*, ci devus, anstataŭ krii, kiel pavo, eldiri ian sensencan frazon.

Tigeleno ekmordis la lipojn. Li ne estis tre kontenta, ke Nerono decidis deklami hodiaŭ novan kanton, ĉar tio prezentis kampon, sur kiu li ne povis konkuri kun Petronio. Efektive, dum la deklamado Nerono malgraŭvole, pro la malnova kutimo, turnadis la okulojn al Petronio, zorge atentante, kion li legos en lia vizaĝo. Kaj tiu ĉi aŭskultis, levante iafoje la brovojn, iafoje kapjesante, iafoje streĉante la atenton, kvazaŭ li volus kontroli, ĉu li bone aŭdis. Kaj poste li aŭ laŭdis, aŭ kritikis, postulante korektojn aŭ poluron de kelkaj versoj. Nerono mem sentis, ke aliaj en troigitaj laŭdoj celas nur la propran bonon, dum li nur sola okupas sin per la poezio por la poezio mem, li sola estas kompetenta, kaj se li ion laŭdas, oni povas esti certa, ke la versoj meritas laŭdon. Kaj iom post iom li komencis paroli kun li, diskuti, kaj fine, kiam Petronio esprimis dubon pri trafeco de iu parolturno, Nerono diris al li:

- Ci vidos en la lasta kanto, kial mi ĝin uzis.



«Ha!» – ekpensis Petronio, – «do mi ĝisvivos la lastan kanton.»

Kaj pluraj, aŭdinte tion, diris al si mem:

«Ve al mi! Petronio, havante lasitan tempon, povas reakiri la favoron kaj faligi eĉ Tigelenon.»

Kaj denove oni komencis proksimiĝi al li. Sed la fino de la vespero estis malpli feliĉa, ĉar Nerono en la momento, kiam Petronio lin adiaŭis, demandis subite kun kuntiritaj palpebroj kaj kun vizaĝo kune malica kaj ĝojplena:

– Kaj kial Vinicio ne venis?

Se Petronio estus certa, ke Vinicio kaj Ligia jam estas ekster la urbaj pordegoj, li redirus: «Li edziĝis laŭ cia permeso kaj forveturis». Sed, vidante strangan rideton de Nerono, li rediris:

– Cia invito, ho dia, ne trovis lin hejme.

– Diru al li, ke mi plezure lin vidos, – respondis Nerono, – kaj diru al li en mia nomo, ke li ne preterlasu la cirkoludojn, en kiuj partoprenos kristanoj.

Petronion maltrankviligis tiuj ĉi vortoj, ĉar ŝajnis al li, ke ili rilatas rekte al Ligia. Enirinte la portilon, li ordonis porti sin hejmen eĉ pli rapide ol matene. Ĝi ne estis tamen facila afero. Antaŭ la domo de Tiberio staris amasa densa kaj brua, ebria, kiel antaŭe, tamen ne kantanta, ne dancanta, sed kvazaŭ agitita. De malproksime aŭdiĝadis

iaj krioj, kiujn Petronio komence ne povis kompreni, sed kiuj potenciĝadis, kreskis kaj fine ŝanĝis sin en unu sovaĝan muĝon:

— La kristanojn al leonoj!!

La brilaj portiloj de la korteganoj movis sin antaŭen meze de la hurlanta amaso. El la fundoj de bruligitaj stratoj alkuradis ĉiam novaj aroj, kiuj, ekaŭdinte la ekkrion, komencis ĝin ripeti. Oni transdonadis el buŝo al buŝo la famon, ke la kaptado daŭras jam de la tagmezo, ke oni kaptis jam multegajn brulmetintojn, kaj baldaŭ sur ĉiuj nove skizitaj kaj malnovaj stratoj, en malvastejoj, falintaj en rubojn, ĉirkaŭ Palatino, sur ĉiuj montetoj kaj en ĉiuj ĝardenoj, tra tuta larĝa kaj longa Romo sonis ekkrioj ĉiam pli furiozaj:

— La kristanojn al leonoj!!

— Brutaro, — ripetadis Petronio, — popolo inda je la imperiestro!

Kaj li komencis pensi, ke tia mondo, bazita sur perforto, sur krueleco, pri kiu eĉ barbaroj havis nenian imagon, sur krimoj kaj sur furioza diboĉado, ne povas tamen daŭri. Romo estis estro de la mondo, sed ankaŭ absceso de la mondo. Spiris de ĝi kadavraodoro. Sur la putran vivon estis falanta la ombro de morto. Ofte oni parolis pri tio eĉ inter la aŭgustanoj, sed antaŭ la okuloj de Petronio neni-

am pli klare ekstaris tiu vero, ke tiu florkronita ĉaro, sur kiu staras, kiel triumfanto, Romo, trenante post si katenitan araĉon da nacioj, iras al abismo. La vivo de la mondreganta urbego ekŝajnis al li ia arlekena procesio kaj ia orgio, kiu tamen devas finiĝi.

Li komprenis nun, ke sole la kristanoj havas iajn novajn bazojn de la vivo, sed li opiniis, ke el la kristanoj restos baldaŭ neniu. Kaj tiam?

La arlekena procesio iros pluen direktate de Nerono, kaj se Nerono pasos, troviĝos iu alia, same aŭ pli malbona, ĉar kun tia popolo kaj tiaj patricioj estas neniaj kaŭzoj, ke troviĝu iu pli inda. Estos nova orgio, kaj krome ĉiam pli malnobla kaj pli abomena.

Kaj orgio ne povas daŭri eterne; oni devas post ĝi iri dormi, simple pro nura laceco.

Pensante pri tio ĉi, Petronio mem eksentis sin treege laca. Ĉu valoras vivi, kaj plie, vivi en necerteco pri la morgaŭo nur por rigardi similan ordon de la mondo? La genio de morto ne estas ja malpli bela ol la genio de dormo, kaj ankaŭ li havas flugilojn ĉe la brakoj.

La portilo haltis antaŭ la pordo de la domo, kiun la gardema pordisto tuj malfermis.

— Ĉu la nobla Vinicio revenis? — demandis lin Petronio.

— Antaŭ momento, sinjoro, — respondis la sklavo.

«Sekve li ŝin ne rekaptis!» — ekpensis Petronio.

Kaj, deĵetinte la togon, li enkuris en la atrion. Vinicio sidis sur tripiedo, kun kapo mallecita preskaŭ ĝis la genuoj kaj kun manoj sur la kapo, sed je la bruo de la paŝoj li levis sian ŝtonsimilan vizaĝon, en kiu nur la okuloj febre brilis.

— Ci venis tro malfrue? — demandis Petronio.

— Jes. Oni malliberigis ŝin antaŭtagmeze.

Sekvis momento da silento.

— Ĉu ci vidis ŝin?

— Jes.

— Kie ŝi estas?

— En la Mamertina malliberejo.

Petronio ekstremis kaj komencis rigardi Vinicion per demandaj okuloj.

Tiu komprenis.

— Ne! — li diris. — Oni ne metis ŝin en Tulianumon<sup>295</sup>, nek en la mezan malliberejon. Mi subaĉetis la gardiston, ke li cedu al ŝi sian ĉambreton. Urso kuŝiĝis ĉe la sojlo kaj gardas ŝin.

— Kial Urso ne defendis ŝin?

<sup>295</sup> La plej malalta parto de la malliberejo, kuŝanta tute sub la tero, kun unu sola malfermaĵo en la plafono. Tie mortis pro malsato *Jugurtha*. (*Nota de la aŭtoro.*) — Latine *Carcer Tullianum*.

— Oni sendis kvindek pretorianojn. Cetere Lino malpermesis al li.

— Kaj Lino?

— Lino estas mortanta. Tial oni lin ne prenis.

— Kion ci intencas?

— Savi ŝin aŭ morti kun ŝi. Ankaŭ mi kredas je Kristo.

Vinicio parolis ŝajne trankvile, sed en lia voĉo estis io tiel korŝira, ke la koro de Petronio ekstremitis de sincera kompatato.

— Mi cin komprenas, — li diris, — sed kiel ci volas ŝin savi?

— Mi subaĉetis la gardistojn, unue por sekurigi ŝin de ofendoj, kaj due, ke ili ne malhelpu ŝian forkuron.

— Kiam ĝi devas okazi?

— Ili respondis, ke ili ne povas transdoni ŝin al mi senprokraste, ĉar ili timas la respondecon. Kiam la malliberuloj pleniĝos per amasoj da homoj kaj kiam oni perdos la kalkulon de la malliberuloj, tiam ili redonos ŝin al mi. Sed tio estas lasta rimedo. Antaŭe ci savu ŝin kaj min! Ci estas amiko de la imperiestro. Li mem donis al mi Ligian. Iru al li kaj savu min!

Petronio, anstataŭ respondi, vokis sklavon kaj, ordoninte al li alporti du malhelajn mantelojn kaj du glavojn, sin turnis al Vinicio.

— Envoje mi rakontos al ci, — li diris. — Dume prenu mantelon, prenu armilon kaj ni iru en la malliberejon. Tie donu al la gardistoj cent mil sestercojn, donu sumon duoblan aŭ kvinoblan, ke ili nur ellasu Ligian senprokraste. Alie estos tro malfrue.

— Ni iru, — diris Vinicio.

Kaj post momento ambaŭ troviĝis sur la strato.

— Kaj nun aŭskultu min, — diris Petronio. — Mi ne volis perdi tempon. Mi estas de hodiaŭ en malfavoro. Mia propra vivo kvazaŭ pendas sur hareto kaj tial mi povas nenion efiki ĉe la imperiestro. Eĉ pli malbone! Mi certas, ke li agos kontraŭ mia peto. Se tiel ne estus, ĉu mi konsilus al ci, ke ci forkuru kun Ligia aŭ rekaptu ŝin? En tiu okazo, se ci sukcesus forkuri, la kolero de Nerono direktus sin kontraŭ mi. Sed pli verŝajne li farus hodiaŭ ion laŭcia peto ol laŭ mia. Ne kalkulu tamen ankaŭ je tio. Eligu ŝin el la malliberejo kaj forkuru! Nenio pli restas al ci. Kiam tio ne sukcesos, venos la vico por aliaj rimedoj. Dume sciu, ke oni malliberigis Ligian ne nur pro la kredo je Kristo. Ŝin kaj cin persekutas la kolero de Popea. Ĉu ci memoras, ke ci ofendis la aŭgustinon kaj ke ci rifuzis ŝian amon? Ŝi scias, ke ci rifuzis ĝin pro Ligia, kiun eĉ sen tiu kaŭzo ŝi ekmalamis de la unua rigardo. Ŝi ja penis jam antaŭe pereigi Ligian, atribuante al ŝiaj sorĉoj la morton de

sia infano. En tio, kio okazis, estas la mano de Popea! Per kio ci povas klarigi, ke Ligia estis malliberigita unua? Kiu povis montri la domon de Lino? Mi diras al ci, ke oni spionis ŝin jam delonge! Mi scias, ke mi disŝiras cian animon kaj senigas cin de la lastaj esperoj, sed mi tion diras al ci tial, ke se ci ŝin ne liberigos, antaŭ ol venos al ili la ideo, ke ci tion provos, tiam vi ambaŭ pereos.

— Jes! Mi komprenas! — respondis Vinicio.

La stratoj pro la malfrua horo estis malplenaj, tamen la pluan interparolon rompis al ili de kontraŭe iranta ebria gladiatoro, kiu ŝanceliĝis sur Petronion tiel, ke li apogis sin per la mano sur lian ŝultron, ĉirkaŭblovante lian vizaĝon per vinsaturita spiro kaj kriante per raŭka voĉo:

— La kristanojn al leonoj!

— Mirmilono<sup>296</sup>, — diris trankvile Petronio, — akceptu bonan konsilon kaj iru cian vojon.

Tiam la ebrulo subite kaptis lian ŝultron ankaŭ per la alia mano:

— Kriu kune kun mi, aŭ mi rompos al ci la nukon: la kristanojn al leonoj!

Sed la nervoj de Petronio havis jam sufiĉe da tiuj krioj. De la momento de la eliro el Palatino ili sufokis lin, ki-

<sup>296</sup> Latine *mirmillo*, *-onis* — gladiatoro en la peza gaŭla kiraso kun figureto de fiŝo sur la pinto de la kasko.

el inkubo, kaj ŝiris liajn orelojn, do, kiam li ekvidis krome super si levitan pugnon de la grandegulo, elĉerpiĝis la mezuro de lia pacienco.

— Amiko, — li diris, — ci odoras vinon kaj malhelpas al mi.

Kaj tiel parolante, li enbatis en lian bruston ĝis la tenilo mallongan glavon, per kiu li armis sin, elirante el la domo, poste, preninte Vinicion sub la brakon, li parolis plu, kvazaŭ nenio estus okazinta:

— Nerono diris al mi hodiaŭ: «Diru en mia nomo al Vinicio, ke li ne preterlasu la cirkoludojn, en kiuj partoprenos kristanoj.» Ĉu ci komprenas, kion ĝi signifas? Oni volas fari al si spektaklon el cia doloro. Ĝi estas afero decidita. Eble tial oni malliberigis ĝis nun nek cin, nek min. Se ci ne sukcesos ŝin tuj eligi, tiam ... mi ne scias!... Eble Akteo propetos por ci, sed ĉu ŝi ion efikos?... Ankaŭ ciaj siciliaj posedaĵoj povus eksciti la avidon de Tigeleno. Provu!

— Mi donos al li ĉion, kion mi posedas, — respondis Vinicio.

De Karinoj al Forumo ne estis tre malproksime, baldaŭ do ili alvenis. La nokto komencis jam paliĝi kaj la muregoj de la citadelo estis jam klare videblaj en la ombro.



Subite, kiam ili flankiĝis al la Mamertina malliberejo, Petronio haltis kaj diris:

— Pretorianoj!... Tro malfrue!

La malliberejon ĉirkaŭis efektive duobla vico da soldatoj. La krepusko arĝente koloris iliajn ferajn kaskojn kaj la akraĵojn de la lancoj.

La vizaĝo de Vinicio iĝis pala, kiel marmoro.

— Ni iru, — li diris.

Post momento ili ekstaris antaŭ la vico. Petronio, kiu, dotita de neordinara memoro, konis ne nur la ĉefulojn, sed preskaŭ ĉiujn soldatojn de la pretorio, rimarkis tuj kohortestron konatan al si kaj faris al li signon.

— Kio do, Nigro? — li diris. — Ĉu oni ordonis al vi gardi la malliberejon?

— Jes, nobla Petronio. La prefekto timis, ke oni povus provi rekapti la brulmetintojn.

— Ĉu estas al vi ordonite nenion enlasi? — demandis Vinicio.

— Ne, sinjoro. Konatoj vizitados la malliberulojn kaj tiel ni kaptos pli da kristanoj.

— Sekve enlasu min, — diris Vinicio.

Kaj, preminte la manon al Petronio, li diris al li:

— Vidiĝu kun Akteo, kaj mi venos por ekscii, kian respondon ŝi donis al ci.

— Venu, — respondis Petronio.

En la sama momento sub la tero kaj trans la dikaj muroj aŭdiĝis kantado. La kanto, komence malklara kaj obtuza, kreskis ĉiam pli. Voĉoj viraj, virinaj kaj infanaj ligis sin en unu harmonian ĥoron. La tuta malliberejo komencis en la silento de la krepusko kanti, kiel harpo. Sed tio ne estis voĉoj de plendo, nek de malespero. Kontraŭe, sonis en ili ĝojo kaj triumfo.

La soldatoj rigardis sin reciproke kun miro. Sur la ĉielo aperis la unuaj oraj kaj rozaj briloj de la tagiĝo.

## Ĉapitro 52<sup>a</sup>

La ekkrio: «La kristanojn al leonoj!» sonis senĉese en ĉiuj kvartaloj de la urbo. Ekde la unua momento neniu dubis, ke ili estas la veraj kaŭzintoj de la malfeliĉo, kaj oni tiom malpli emis dubi, ke ilia puno devis prezenti grandiozan amuzon por la popolo. Sed disvastiĝis la opinio, ke la malfeliĉo ne alprenus tiel teruran amplekson sen kolero de la dioj, oni ordonis do fari en la temploj *kulpoferojn*,<sup>297</sup> t.e. purigajn oferojn. Laŭ la inspiro de la Sibilaj libroj la senato aranĝis solenaĵojn kaj publikajn preĝojn al Vulcano, Cereso kaj Prozerpino. Matronoj faris oferojn al Junono; en granda procesio ili iris al la marbordo por ĉerpi

---

<sup>297</sup> Latine *piacula*.

iom da akvo kaj ŝprucigi ĝin sur la statuon de la diino. Edzinigitaj virinoj preparis festenojn por la dioj<sup>298</sup> kaj pasigadis la noktojn maldorme. La tuta Romo puriĝadis de pekoj, faradis oferdonojn kaj petis pardonon de la Senmortuloj.

Kaj dume meze de la ruinoj oni vojskizis novajn strategojn. Tie kaj ie oni metis jam la fundamentojn de novaj, grandiozaj domoj, palacoj kaj temploj. Antaŭ ĉio tamen oni konstruis kun senekzempla rapideco grandegajn lignajn amfiteatrojn, kie devis morti la kristanoj. Tuj post la interkonsilo en la domo de Tiberio oni sendis al la prokonsuloj la ordonojn, ke ili havigu sovaĝajn bestojn. Tigeleno malplenigis la bestejojn de ĉiuj italujaj urboj, ne esceptante la malpli grandajn. En Afriko oni aranĝis laŭ lia ordono grandegan ĉason, en kiu devis partopreni la tuta loka loĝantaro. Oni venigadis elefantojn kaj tigrojn el Azio, krokodilojn kaj hipopotamojn el Nilo, leonojn el Atlaso, lupojn kaj ursojn el Pireneoj, furiozajn hundojn el Hibernio, hundojn-molosojn el Epiro, bubalojn kaj grandegajn timindajn urojn el Ĝermanujo. Pro la nombro de malliberigitoj la cirkoludoj devis per sia amplekso superi ĉion ĝis nun viditan. Nerono deziris dronigi la memoron pri la brulo en sango kaj ebriigi per ĝi Romon, neniam do

<sup>298</sup> *Selisteria* aŭ *Lectisteria*. (Noto le la aŭtoro.)

iu sangoverŝado promesis esti pli brila.

La ĝojekscitita popolo helpis al la *vigiloj* kaj pretorianoj ĉasi la kristanojn. Tio ne estis afero malfacila, ĉar tutaj iliaj aroj, tendostarantaj ankoraŭ kune kun la aliaj loĝantoj meze de la ĝardenoj, laŭte konfesadis sian kredon. Kiam oni ilin ĉirkaŭadis, ili surgenuiĝadis kaj, kantante kantojn, lasis sin forkapti sen ia kontraŭstaro. Sed ilia pacienco nur grandigadis la koleron de la popolo, kiu, ne komprenante ĝian kialon, atribuis ĝin al ilia ŝtonkoreco kaj krimobstineco. Furiozo ekregis la persekutantojn. Okazis iafoje, ke la amaso rabis kristanojn el la manoj de soldatoj kaj disŝiris ilin per la propraj manoj; virinojn oni trenis je la haroj en malliberejojn; al infanoj oni frakasis la kapojn kontraŭ ŝtonoj. Miloj da homoj tage kaj nokte trakuradis hurlante la stratojn. Oni serĉis novajn viktimojn inter ruinoj, en kamenoj kaj en keloj. Antaŭ la malliberejoj, ĉe fajroj, ĉirkaŭ bareloj kun vino, oni dancis bakĥajn dancojn. Vespere oni aŭskultis kun ravekscito tondrosimilajn muĝojn, kiuj sonis tra la tuta urbo. La malliberejoj estis plenegaj je miloj da homoj kaj ĉiutage ankoraŭ la stratamaso kaj la pretorianoj alpeladis novajn viktimojn. Kompato estingiĝis. Ŝajnis, ke la homoj forgesis paroli kaj en sovaĝa frenezo memoris nur unu solan ekkrion: «la kristanojn al leonoj!» Venis strange varmegaj

tagoj kaj noktoj tiel sufokaj, kiaj estis neniam antaŭe: la aero mem estis kvazaŭ saturita per furiozo, sango kaj krimo.

Kaj al tiu plenplena mezuro da kruelaĵoj konformis same plenplena mezuro da avido je martireco. La konfesantoj de Kristo iris memvole al morto kaj eĉ serĉis ĝin, ĝis ilin retenis severaj ordonoj de la ĉefoj. Laŭ ilia instrukcio oni komencis kunvenadi nur ekster la urbo, en subterejoj ĉe la Vojo Appia kaj en apudurbaj vinberejoj, apartenantaj al patricioj-kristanoj, el kiuj neniu estis ĝis nun malliberigita. Sur Palatino oni sciis delonge, ke al la konfesantoj de Kristo apartenas Flavio, kaj Domitilla, kaj Pomponia Grecina, kaj Kornelio Pudento<sup>299</sup>, kaj Vinicio; Nerono mem timis tamen, ke la popolo ne lasos al si kredigi, ke tiaj homoj bruligis Romon, kaj ĉar oni celis antaŭ ĉio konvinki la popolon, tial la punon kaj venĝon oni prokrastis ĝis postaj tagoj. Aliaj opiniis, ke tiujn patriciojn savis la influo de Akteo. La opinio estis malprava. Petronio, disiĝinte kun Vinicio, iris, vere, al Akteo por peti ŝian helpon por Ligia, sed ŝi povis al li oferi sole larmojn, ĉar ŝi vivis en forgeso kaj doloro, nur tiom tolerata, kiom ŝi kaŝis sin de Popea kaj de la imperiestro.

Ŝi vizitis tamen Ligian en la malliberejo, portis al ŝi

<sup>299</sup> *Quintus Cornelius Pudens* — Roma senatano kaj frua kristano.

vestojn kaj nutraĵon, kaj antaŭ ĉio sekurigis ŝin tiom pli de ofendoj flanke de la jam cetera subaĉetitaj malliberejaj gardistoj.

Petronio tamen, ne povante forgesi, ke sen lia interveno kaj la ideo forpreni Ligian el la domo de Aŭlo la knabino ne estus nun verŝajne en malliberejo, kaj krome, volante venki en la ludo kontraŭ Tigeleno, ne ŝparis tempon, nek klopodojn. En la daŭro de kelkaj tagoj li parolis kun Seneko, kun Domicio Afro, kun Krispinilla, pere de kiu li volis atingi Popean, kun Terpno kaj Diodoro, kun la bellega Pitagoro, fine kun Alituro kaj Pariso, al kiuj Nerono ordinare nenion rifuzis. Kun la helpo de Ĥrizotemiso, kiu estis nun amatino de Vatinio, li penis havigi al si eĉ lian helpon, malavarante al li kaj al la aliaj tiel promesojn, kiel monon.

Sed ĉiuj tiuj klopodoj restis senefikaj. Seneko, necerta pri la propra morgaŭo, komencis persvadi al li, ke la kristanoj, eĉ se ili ne bruligis Romon, devas esti ekstermitaj por ĝia bono; unuvorte, li pravigis la venontan buĉadon per ŝtata racio. Terpno kaj Diodoro prenis monon, sed faris repage nenion. Vatinio sciigis al la imperiestro, ke oni penis lin subaĉeti, kaj nur la sola Alituro, kiu, komence malamike agordita kontraŭ la kristanoj, nun kompatis ilin, kuraĝis paroli al Nerono pri la malliberigita knabino

kaj propeti por ŝi; li tamen ricevis nenion, krom la respondo:

— Ĉu ci opinias, ke mi havas animon malpli grandan ol Bruto, kiu por la bono de Romo ne ŝparis la proprajn filojn?

Kaj kiam li ripetis tiun ĉi respondon al Petronio, tiu ĉi diris:

— Se li trovis la komparon kun Bruto, estas jam neniam rimedo.

Li bedaŭris tamen Vinicion kaj kaptadis lin timo, ĉu li atencos la propran vivon.

«Nun,» — li diris al si, — «subtenas lin ankoraŭ la klopodoj, kiujn li faras por ŝin savi, ŝia vido kaj la sufero mem; sed kiam ĉiuj rimedoj montriĝos vanaj kaj kiam estingiĝos la lasta fajrero de la espero, je Kastoro! li ne postvivos ŝin kaj ĵetos sin sur glavon».

Petronio komprenis eĉ pli bone, ke oni povas tiel fini, ol ke oni povas tiel ami kaj tiel suferi.

Dume Vinicio faris ankoraŭ ĉion, kion povis koncepti lia menso por savi Ligian. Li vizitadis la aŭgustanojn kaj li, iam tiel fieraj, petegis nun, kiel almozon, ilian helpon. Pere de Vitelio li oferis al Tigeleno siajn siciliajn posedaĵojn kaj ĉion, kion la prefekto postulus. Tigeleno tamen, ne volante verŝajne inciti kontraŭ si la aŭgustinon, rifuz-

is. Iri al la imperiestro mem, ĉirkaŭbraki liajn genuojn kaj petegi efikus nenion; Vinicio vere volis eĉ tion fari, sed Petronio, aŭdinte pri tiu intenco, demandis:

— Kaj se li rifuzos al ci, se li respondos per ŝerco aŭ per malnobla minaco, kion ci faros?

Je tio la trajtoj de Vinicio tordiĝis de doloro kaj furiozo, kaj el inter la kunpremitaj makzeloj komencis eliĝi grinco.

— Jes! — diris Petronio, — tial mi ĝin malkonsilas. Ci baros ĉiujn vojojn de savo.

Sed Vinicio sin ekregis kaj, ŝovante la manon sur la frunto, kovrita de malvarma ŝvito, diris:

— Ne! Ne! Mi estas kristano!...

— Kaj ci forgesos tion, kiel ci forgesis antaŭ momento. Ci rajtas pereigi cin mem, sed ne ŝin. Memoru, kion suferis antaŭ la morto la filino de Sejano.

Parolante tiel, li ne estis tute sincera, ĉar li zorgis pli multe pri Vinicio ol pri Ligia. Li sciis tamen, ke neniel li detenos la junan tribunuson de tiel danĝera paŝo, nur sole prezentante al li, ke ĝi povus rezultigi senrevokan pereon por Ligia. Cetere, li estis prava, ĉar sur Palatino oni antaŭvidis venon de la juna tribunuso kaj entreprenis konformajn gardrimedojn.

Tamen la sufero de Vinicio superis ĉion, kion la hom-



aj fortoj povas elporti. De la momento, kiam Ligia estis malliberigita kaj kiam falis sur ŝin la brilo de venonta martireco, ne nur li ekamis ŝin centoble pli multe, sed komencis simple preskaŭ kulti ŝin en la animo, kiel ian superhoman estaĵon. Kaj nun je la penso, ke tiun ĉi estaĵon, kune amegatan kaj sanktan, li devas perdi, ke krom la morto povas trafi ŝin torturoj, pli teruraj ol la morto mem, la sango koaguladis en liaj vejnoj, la animo ŝanĝadis sin en unu ĝemon kaj konfuziĝadis lia menso. Iafoje ŝajnis al li, ke lian kranion plenigas flamanta fajro, kiu ĝin bruligos aŭ krevigos. Li ĉesis kompreni, kio okazas, li ĉesis kompreni, kial Kristo — tiu kompatema — tiu Dio — ne venas helpi siajn konfesantojn, kial la fulgokovritaj muroj de Palatino ne falegas en la teron, kaj kun ili Nerono, la aŭgustanoj, la pretoria tendaro kaj tiu ĉi tuta urbo de krimoj. Li pensis, ke ne povas kaj ne rajtas esti alie, kaj ke ĉio tio, kion rigardas liaj okuloj, de kio rompiĝas lia animo kaj hurlas la koro, estas sonĝo. Sed la muĝado de la bestoj diradis al li, ke ĝi estas realaĵo; la klakbruo de la hakiloj, sub kiuj kreskis arenoj, diradis al li, ke ĝi estas realaĵo, kaj konfirmadis tion la bojado de la popolo kaj la plenegaj malliberejoj. Tiam teruriĝadis en li la kredo je Kristo, kaj tiu ĉi teruriĝo estis nova sufero, eble plej granda el ĉiuj.

Dume Petronio diradis al li:

— Memoru, kion antaŭ la morto suferis la filino de Sejano.

## Ĉapitro 53<sup>a</sup>

Ĉio montriĝis vana. Vinicio sin humiligis tiagrade, ke li serĉis protekton ĉe liberigitoj kaj sklavoj de Nerono kaj de Popea, superpagadis iliajn vanajn promesojn, akiradis al si iliajn favorojn per riĉaj donacoj.

Li trovis la unuan edzon de la aŭgustino, Rufrion Kriŝpenon, kaj havigis al si lian leteron; li donacis sian Ancian vilaon al Rufrio, ŝia filo de la unua geedziĝo; sed li nur kolerigis per tio Nerono, kiu malamegis la duonfilon. Per speciala kuriero li sendis leteron en Hispanujon al la dua edzo de Popea, Otono, oferante al li sian tutan havaĵon kaj sin mem — ĝis li rimarkis, ke li estas nur ludaĵo de homoj, kaj ke, se li ŝajnigus, ke la mallibereco de Ligia neniom lin tuŝas, li liberigus ŝin pli facile.

La samon rimarkis ankaŭ Petronio. Dume fluis tago post tago. La amfiteatroj estis finitaj. Oni disdonadis jam la *teserojn* t.e. enirsignojn por *ludus matutinus*. Sed ĉi-foje la matena cirkoludo, pro la senekzempla amaso da viktimoj, devis longiĝi por tagoj, semajnoj kaj monatoj. Oni ne sciis plu, kie loki la kristanojn. La malliberejoj estis plen-

egaj kaj regis en ili febro. La *puticuli*, t.e. komunaj kavoj, kie oni enterigadis sklavojn, komencis esti superplenaj. Naskiĝis timo, ke la malsanoj povus disvastiĝi, oni decidis do rapidi.

Kaj ĉiuj tiuj famoj rebatadis sin je la oreloj de Vinicio, estingante en li la lastajn trabrilojn de la espero. Dum li havis tempon, li povis fari al si iluziojn, ke li eble ankoraŭ ion atingos, sed nun eĉ tempo plu ne estis. La cirkoludoj devis komenciĝi. En plej proksimaj tagoj Ligia povis troviĝi en la cirka tunelo<sup>300</sup>, el kie oni eliradis jam nur sur la arenon. Vinicio, ne sciante, kien ŝin ĵetos la sorto kaj kru-eleco de la perforto, komencis migri tra ĉiuj cirkoj, subaĉeti la gardistojn kaj bestistojn, farante al ili postulojn, kiujn ili ne povis plenumi. Iafoje li rimarkadis, ke li laboras jam nur por fari ŝian morton malpli terura, kaj tiam ĝuste li sentis, ke anstataŭ la cerbo li havas ardantajn karbojn sub la kranio.

Li ne intencis ŝin cetere postvivi kaj decidis pereii kune kun ŝi. Sed li esperis, ke la doloro forbruligos eble en li la vivon, antaŭ ol la terura momento alvenos. Ankaŭ liaj amikoj kaj Petronio jam pensis, ke en plej proksimaj tagoj malfermiĝos antaŭ li la regno de la ombroj. La vizaĝo de Vinicio iĝis nigra kaj simila al tiuj vaksaj maskoj,

<sup>300</sup> Latine *euniculum cuniculus*, subtera irejo.

kiujn oni tenis en la lararejoj. En liaj trajtoj ŝtoniĝis miro, kvazaŭ li ne komprenus, kio okazis kaj kio povas okazi. Kiam iu parolis al li, li levadis per senkonscia gesto la manojn al la kapo kaj, premante la tempiojn, turnadis al la parolanto rigardon teruritan kaj demandan. La noktojn li pasigadis kun Urso ĉe la pordo de Ligia, kaj se ŝi ordonis al li foriri kaj ripozi, li revenadis al Petronio kaj ofte ĝis la mateno promenis tra la atrio. La sklavoj ofte trovadis lin preĝanta, kun suprenlevitaj manoj, aŭ kuŝanta survizaĝe. Li preĝis al Kristo, ĉar tio estis la lasta espero. Ĉio montrigis vana. Ligian povis savi nur miraklo, do Vinicio batis per la frunto la ŝtonajn platojn kaj petegis pri miraklo.

Sed restis al li ankoraŭ tiom da konscio por kompreni, ke preĝo de Petro pli multe signifas ol lia. Petro promesis al li Ligian, Petro lin baptis, Petro mem faris miraklojn, li sekve donu al li helpon kaj subtenon.

Kaj iun nokton li iris serĉi la apostolon. La kristanoj, el kiuj malmultaj jam restis, kaŝis lin nun zorgeme ĉe unuj antaŭ aliaj, timante ke iu, malpli forta en la spirito, povus perfidi lin malgraŭvole aŭ intence. Vinicio, en la ĝenerala konfuzo kaj persekutado tute okupita per la klopodoj por eligi Ligian el la malliberejo, perdis la apostolon de la vido, tiel ke de la tempo de sia bapto li renkontis lin apenaŭ unu fojon, ankoraŭ antaŭ la komenco de la

persekutado. Sed, irinte al tiu fosisto, en kies kabano li estis baptita, li eksciis de li, ke en vinberejo, kuŝanta trans la Sala pordego kaj apartenanta al Kornelio Pudento, okazos kunveno de la kristanoj. La fosisto promesis enkonduki tien Vinicion, certigante, ke ili trovos tie Petron. Efektive, je la krepusko ili eliris kaj, pasinte trans la muregojn, poste irante meze de kavoj, surkreskitaj de kanoj, ili atingis la vinberejon, kuŝantan solece kaj flanke. La kunveno estis okazanta en budo, kie oni ordinare elpremadis vinon. La orelojn de Vinicio atingis ĉe la sojlo la bruo de preĝo, kaj enirinte, li ekvidis ĉe la malklara lumo de lanternoj kelkdek figurojn, genuantajn kaj dronantajn en preĝo. Ili preĝis kvazaŭ litanion: ĥoro da voĉoj, same viraj kiel virinaj, ripetadis ĉiumomente: «Kristo kompatu!» Tremis en tiuj voĉoj profunda, korŝira malĝojo kaj doloro.

Petro ĉeestis. Li genuis fronte, antaŭ ligna kruco, najlita al la muro de la budo, kaj preĝis. Vinicio rekonis de malproksime liajn blankajn harojn kaj levitajn manojn. La unua penso de la juna patricio estis trairi la homan aron, ĵeti sin al la piedoj de la apostolo kaj krei: «savu!» — sed ĉu la soleneco de la preĝo, aŭ malfortiĝo fleksis la genuojn sub li, do ekgenuinte ĉe la eniro, li komencis ripeti kun ĝemo kaj kun manoj kunpremitaj: «Kristo kompatu!» Se li estus konscia, li komprenus, ke ne sole en lia peto

sonis ĝemo kaj ke ne li sola alportis ĉi tien sian doloron, sian suferon kaj sian teruron. Estis en tiu ĉi kunveno eĉ ne unu homa animo, kiu ne perdis koramatajn personojn, kaj kiam la plej fervoraj kaj plej kuraĝaj el la konfesantoj, estis jam malliberigitaj, kiam ĉiumomente vastiĝadis novaj famoj pri ofendoj kaj torturoj, kiujn oni igis ilin suferi en la malliberejoj; kiam la grandegeco de la malfeliĉo superis ĉiajn supozojn, kiam restis sole tiu ĉi areto, estis en ĝi eĉ ne unu koro, kiu ne teruriĝis en sia kredo kaj ne demandis en dubo: kie estas Kristo? Kaj kial li permesas, ke la malbono iĝu pli potenca ol Dio?

Sed dume ili ankoraŭ petegis de li malespere kompaton, ĉar en ĉiu animo bruletis ĝis nun fajrero de espero, ke li venos, neniigos la malbonon, faligos Neronon en abismon kaj ekregos super la mondo ... Ankoraŭ ili rigardis la ĉielon, ankoraŭ ili aŭskultis streĉe, ankoraŭ ili preĝis kun tremo. Ankaŭ Vinicion, laŭgrade kiel li ripetadis: «Kristo kompatu!» komencis posedi ekstazo, sama, kiel iam en la kabano de la fosisto. Jen ili vokas lin el la fundo de doloro, el abismo, jen vokas lin Petro, do en plej proksima momento disŝiriĝos la ĉielo, ekstremos la fundamentoj de la tero kaj venos malsupren li, en brilego senlima, kun steloj ĉe la piedoj, kompatema, sed ankaŭ timinda, li, kiu altigos siajn fidelulojn kaj ordonos al la abismoj engluti la perse-

kutantojn.

Vinicio kovris la vizaĝon per la manoj kaj klinis sin ĝis la tero. Subite ekregis ĉirkaŭ li silento, kvazaŭ timo katenus pluan vokadon en la buŝoj de ĉiuj ĉeestantoj. Kaj ŝajnis al li, ke devas nepre io okazi, ke venos momento de miraklo. Li estis certa, ke kiam li leviĝos kaj malfermos la okulojn, li vidos lumon, de kiu blindiĝas la mortemaj pupiloj, kaj aŭdos voĉon, de kiu svenas la koroj.

Sed la silento daŭris senĉese. Rompis ĝin fine plorĝemo de virino.

Vinicio leviĝis kaj komencis rigardi antaŭen per konsternitaj okuloj.

En la budo, anstataŭ transteraj briloj, flagretis la malklaraj flametoj de la lanternoj, kaj la radioj de la luno, eniĝantaj tra malfermaĵo en la tegmento, plenigadis ĝin per arĝenta lumo. La homoj, kiuj genuis apud Vinicio, levis silente la superlarmitajn okulojn al la kruco; tie kaj ie eksonis aliaj plorĝemoj, kaj de ekstere aŭdiĝadis gardema fajfado de postenantoj. Subite Petro leviĝis kaj turninte sin al la kunvenintoj, diris:

— Infanoj, levu la korojn al nia Savinto kaj oferu al li viajn larmojn.

Kaj li eksilentis. Tiam meze de la kunvenintoj aŭdiĝis virina voĉo, plena je dolora plendo kaj senlima sufero:

— Mi vidvino, havis solan filon, kiu min nutris... Redonu lin al mi, Sinjoro!

Sekvis denove momento de silento. Petro staris antaŭ la genuanta aro, maljuna, zorgoplena, kaj ŝajnis al ili ĉi momente kvazaŭ personigo de kadukeco kaj malforto.

Subite komencis plendi dua voĉo:

— La kaptistoj malhonorigis miajn filinojn, kaj Kristo permesis tion!

Poste tria:

— Mi restis sola kun miaj infanoj, kaj kiam oni min forkaptos, kiu donos al ili panon kaj akvon?

Poste kvara:

— Linon, kiun oni lasis, oni prenis denove kaj transdonis al torturistoj, Sinjoro!

Poste kvina:

— Kiam ni revenos hejmen, kaptos nin pretorianoj. Ni ne scias, kien rifuĝi.

— Ve al ni! Kiu nin ŝirmos?

Kaj tiel en la nokta silento sonis plendo post plendo. La maljuna fiŝkaptisto duonfermis la okulojn kaj skuis sian blankan kapon super tiu homa doloro kaj teruro. Ekregis denove silento, nur la gardistoj fajfosignis ekster la budo.

Vinicio saltleviĝis denove por trapuŝi sin tra la aro de



la kunvenintoj al la apostolo kaj petegi lian helpon, sed subite li ekvidis antaŭ si kvazaŭ abismon, kies bildo senfortigis liajn piedojn. Kio estos, se la apostolo konfesos sian senpovecon, se li atestos, ke la Roma imperiestro estas pli potenca ol Kristo la nazareta? Kaj je tiu penso teruro hirtigis la harojn sur lia kapo, ĉar li eksentis, ke tiam en tiun abismon falos ne nur la resto de lia espero, sed ankaŭ li mem, kaj lia Ligia, kaj lia amo al Kristo, kaj lia kredo, kaj ĉio, per kio li vivis, kaj restos sole morto kaj nokto, senborda, kiel maro.

Kaj dume Petro komencis paroli per voĉo unue tiel mallaŭta, ke apenaŭ oni povis lin aŭdi:

— Miaj infanoj! Sur Golgoto mi vidis, kiel oni najlis Dion al la kruco. Mi aŭdis la martelojn kaj vidis, kiel oni levis supren la krucon, por ke la amasoj rigardu la morton de la Filo de homo...

... ..

... Kaj mi vidis, kiel oni pikis lian flankon kaj kiel li mortis. Kaj tiam, revenante de la kruco, mi kriis en doloro, kiel vi krias: «Ve! Ve! Sinjoro! Ci estas Dio! Kial cion permesis, kial ci mortis kaj afliktis la korojn al ni, kiuj kredis, ke venos cia regno?»...

... Kaj li, Sinjoro kaj Dio nia, en la tria tago leviĝis el mortintoj kaj estis inter ni, ĝis en grandega brileco li su-

preniris en sian regnon...

Kaj ni, ekkoninte la malgrandecon de nia kredo, firmiĝis en la koroj, kaj de tiam ni semas lian semon...

... ..

Poste, turninte sin en la direkton, de kie aŭdiĝis la unua plendo, li komencis paroli per voĉo jam pli forta:

— Kial vi plendas?... Dio mem sin subigis al sufero kaj morto, kaj vi volas, ke li vin ŝirmu kontraŭ ĝi? Ho malgrandfiduloj! Ĉu vi ne komprenis lian instruon, ĉu nur tiun solan vivon li promesis al vi? Jen li venas al vi kaj diras: «Iru Mian vojon», jen li levas vin al Si, kaj vi kroĉiĝas permane al la tero, vokante: «Sinjoro, savu!» Mi, polvo antaŭ Dio, sed antaŭ vi apostolo de Dio kaj lia reprezentanto, diras al vi en la nomo de Kristo: Ne morto estas antaŭ vi, sed vivo, ne torturoj, sed senlimaj ĝojoj, ne ĝemoj kaj larmoj, sed kantado, ne mallibereco, sed regado! Mi, apostolo de Dio, diras al ci, vidvino: cia filo ne mortos, sed naskiĝos en gloro al eterna vivo kaj ci kuniĝos kun li! Al ci, patro, al kiu la kaptistoj malhonoris la senkulpajn filinojn, mi promesas, ke ci retrovos ilin pli blankaj ol la lilioj de Ĥebrono! Al vi, patrinoj, kiujn oni forkaptos de la infanoj, al vi, kiuj perdos la patrojn, al vi, kiuj plendas, al vi, kiuj rigardos la morton de viaj amatoj, al vi, zorgoplenaj, malfeliĉaj, teruritaj, kaj al vi, mortontaj en la nomo

de Kristo, mi diras, ke vi leviĝos kvazaŭ el dormo al feliĉa maldormo kaj kvazaŭ el nokto al la tagiĝo de Dio. En la nomo de Kristo, falu la vualo de viaj okuloj kaj ekflamu viaj koroj!

Dirinte ĉi tion, li levis la manon, kvazaŭ li ordonus, kaj ili eksentis novan sangon en la vejnoj kaj kune tremon en la ostoj, ĉar staris jam antaŭ ili ne maljunulo kaduka kaj zorgopremita, sed potenculo, kiu prenis iliajn animojn kaj levis ilin el polvo kaj el teruro.

— Amen! — proklamis kelkaj voĉoj.

Kaj el liaj okuloj fulmis brilo ĉiam pli granda, radiis de li potenco, radiis majesteco, radiis sankteco. La kapoj klinis sin antaŭ li, kaj li, kiam eksilentis la «amen», parolis plu:

— Semu en ploro, por ke vi rikoltu en ĝojo. Kial vi timas la forton de la malbono? Super la tero, super Romo, super la muregoj de l' urboj estas la Sinjoro, kiu ekloĝis en vi. Ŝtonoj malsekiĝos de larmoj, sablo saturiĝos per sango, kavoj estos plenaj je viaj korpoj, tamen mi diras al vi: vi triumfos! La Sinjoro venas konkeri tiun ĉi urbon de krimoj, tiraneco kaj fiereco, kaj vi estas lia legio! Kaj kiel li mem elaĉetis per sufero kaj sango la krimojn de la mondo, tiel li volas, ke vi elaĉetu per sufero kaj sango tiun ĉi neston de malvirto!... Tion ĉi li anoncas al vi per mia

buŝo!

Kaj li dismetis la manojn, fiksas la okulojn supren, dum iliaj koroj ĉesis preskaŭ bati en la brustoj, ĉar ili ek-sentis, ke li vidas ion, kion ne povas ekvidi iliaj mortemaj pupiloj.

Efektive, lia vizaĝo ŝanĝiĝis kaj ekbrilis de lumo, li rigardis dum kelka tempo en silento, kvazaŭ muta de ravo, sed post momento oni ekaŭdis lian voĉon:

— Jen ci estas, Sinjoro, kaj ci montras al mi ciajn voj-ojn!... Kiel do, ho Kristo!... Ne en Jerusalemo, sed en tiu ĉi nesto de Satano ci volas fondi cian ĉefurbon? Ĉi tie, el tiuj ĉi larmoj, el tiu ĉi sango ci volas konstrui cian Eklezion? Ĉi tie, kie hodiaŭ regas Nerono, estas fondota cia regno? Ho, Sinjoro, Sinjoro! Kaj ci ordonas al tiuj ĉi timigitoj, ke ili konstruu la fundamentojn de la Ciono de l' mondo, kaj al mia spirito ci ordonas regi tiun Cionon kaj la popolojn de la tero?... Kaj jen ci verŝas torenton da potenco sur la malfortulojn, ke ili iĝu fortaj, kaj ci ordonas al mi paŝti cian ŝafojn, ĝis la fino de l' jarcentoj... Ho, estu glorata pro cian verdiktoj, ci, kiu ordonas triumfi. Hosana! Hosana!

Tiuj, kiuj estis timantaj, leviĝis, en tiujn, kiuj estis ek-dubintaj, fluis torentoj da kredo. Kelkaj voĉoj ekkriis kune: «Hosana!» aliaj: «pro Kristo!» post kio sekvis silento. Helaj someraj fulmoj lumigadis la internon de la budo

kaj la vizaĝojn, palajn de emocio.

Petro, kun rigardo sorĉfiksita sur la vizio, preĝis ankorau longe, sed fine li vekigis, turnis al la kunvenintoj sian inspiritan, lumplenan kapon kaj diris:

— Kiel la Sinjoro venkis en vi la dubon, tiel vi iru venki en lia nomo!

Kaj kvankam li jam sciis, ke ili venkos, kvankam li sciis, kio elkreskos el iliaj larmoj kaj sango, tamen lia voĉo tremis de kortuŝo, kiam li komencis beni ilin per krucosigno kaj parolis:

— Kaj nun mi benas vin, miaj infanoj, por turmentoj, por morto, por eterneco!

Sed ili ariĝis ĉirkaŭ li, petegante:

— Ni estas jam pretaj, sed ci ŝirmu cian sanktan kapon, ĉar ci estas reprezentanto, kiu regas en la nomo de Kristo!

Kaj tiel parolante, ili kroĉis sin al liaj vestoj, dum li metis la manojn sur iliajn kapojn kaj benis ĉiun aparte, kiel patro benas infanojn, kiujn li sendas en malproksiman vojon.

Kaj tuj ili komencis eliri el la budo, ĉar jam ili avidis atingi siajn hejmojn, kaj el tie malliberejojn kaj arenojn. Iliaj mensoj forŝiriĝis jam de la tero, la animoj direktis la flugilojn al la eterneco, kaj ili iris, kvazaŭ en dormo aŭ

ekstazo, kontraŭmeti la forton, kiu estis en ili, al la kruel-eco de la «monstro».

La apostolon prenis Nereo, servisto de Pudento, kaj kondukis lin sur vojeto, kaŝita meze de la vinberarbustoj, al sia domo. Sed en la luma nokto sekvis ilin Vinicio, kaj kiam ili atingis fine la kabanon de Nereo, li ĵetis sin subite al la piedoj de la apostolo.

Tiu, rekoninte lin, demandis:

— Kion ci deziras, filo?

Sed Vinicio, post tio, kion li aŭdis en la budo, kuraĝis jam petegi de li nenion, nur, ĉirkaŭpreninte ambaŭmane liajn piedojn, alpremis al ili, plorĝemante, la frunton, vokante en tiu senvorta maniero kompaton.

Kaj Petro diris:

— Mi scias. Oni prenis la knabinon, kiun ci amas. Preĝu pro ŝi.

— Sinjoro! — ekĝemis Vinicio, ĉirkaŭprenante ankorau pli forte la piedojn de la apostolo. — Sinjoro! Mi estas mizera vermo, sed ci konis Kriston, ci lin petegu, ci preĝu pro ŝi.

Kaj li tremis de doloro, kiel folio, kaj fruntobatis la teron, ĉar ekkoninte la potencon de la apostolo, li sciis, ke Petro sola povas ŝin redoni al li.

Kaj Petro iĝis tuŝita de tiu ĉi doloro. Li rememoris, ki-

el iam Ligia, mallaŭdita de Krispo, same kuŝis ĉe liaj piedoj, petegante kompaton. Li rememoris, ke li levis ŝin kaj konsolis, li levis do nun Vinicion.

— Fileto, — li diris, — mi preĝos pro ŝi, sed ci memoru, kion mi diris al tiuj dubantoj: ke Dio mem suferis la krucmorton, kaj memoru, ke post tiu ĉi vivo komenciĝas alia, eterna.

— Mi scias!... mi aŭdis, — respondis Vinicio, kaptante aeron en la palan buŝon, — sed vidu, sinjoro ... mi ne povas! Se bezona estas sango, petu Kriston, ke li prenu mian ... Mi estas soldato. Li duobligu al mi, li triobligu la turmentojn por ŝi destinitajn, mi eltenos! Sed li savu ŝin! Ŝi estas ankoraŭ infano, sinjoro! Kaj li estas pli potenca ol la imperiestro, mi kredas! Pli potenca!... Ci mem ŝin amis. Ci benis nin ambaŭ! Ŝi estas ankoraŭ senkulpa infano!

Post tio li kliniĝis denove kaj, almetinte la vizaĝon al la genuoj de Petro, komencis ripeti:

— Ci konis Kriston, sinjoro! Ci lin konis, li cin aŭskultos! Petu pro ŝi!

Kaj Petro fermis la palpebrojn kaj preĝis fervore.

Someraj fulmoj komencis denove lumigi la ĉielon. Vinicio rigardis ĉe ilia brilo la buŝon de la apostolo, atendante el ĝi verdikton de vivo aŭ morto. En la silento oni aŭdis koturnojn, vokantajn unu aliajn en la vinberejo, kaj

obtuzan, malproksiman rebruon de piedmueliloj, starantaj ĉe la Vojo Sala.

— Vinicio, — demandis fine la apostolo, — ĉu ci kredas?

— Sinjoro, ĉu alie mi venus ĉi tien? — respondis Vinicio.

— KREDU DO ĜIS LA FINO, ĈAR LA KREDO MOVAS MONTOJN. Se ci do eĉ vidus tiun knabinon sub la glavo de ekzekutisto aŭ en la faŭko de leono, kredu ankoraŭ, ke Kristo povas ŝin savi. KREDU KAJ PREĜU AL LI, KAJ MI PREĜOS KUN CI.

Poste, levinte la vizaĝon al la ĉielo, li parolis laŭte:

— Kristo kompatema, rigardu tiun ĉi dolorplenan koron kaj konsolu ĝin! Kristo kompatema, konformigu la venton al la lano de l' ŝafido! Kristo kompatema, kiu petis la Patron, ke li forturnu la kalikon da maldolĉaĵo de cia buŝo, forturnu ĝin nun de la buŝo de tiu ĉi cia servanto! Amen!

Kaj Vinicio, etendinte la manojn al la steloj, parolis ĝemante:

— Ho Kristo! Mi estas cia! Prenu min anstataŭ ŝin! Oriente la ĉielo komencis tagiĝi.



## Ĉapitro 54<sup>a</sup>

Vinicio, forlasinte la apostolon, iris al la malliberejo kun koro, renaskita de la espero. Ie, en la fundo de lia animo, kriis ankoraŭ laŭte malespero kaj teruro, sed li subpremis en si tiujn voĉojn. Ŝajnis al li neeble, ke la propeto de la reprezentanto de Dio kaj la potenco de lia preĝo restu senefikaj. Li timis ne havi la esperon, li timis ekdubi.

«Mi kredos je lia kompatemo, — li parolis al si, — eĉ se mi ekvidos ŝin en la faŭko de leono».

Kaj je tiu penso, kvankam tremis en li la animo kaj malvarma ŝvito surverŝadis liajn tempiojn, li kredis. Ĉiu ekbato de lia koro estis nun preĝo. Li komencis kompreni, ke la kredo movas montojn, ĉar li eksentis en si ian strangan forton, kiun li sentis neniam antaŭe. Ŝajnis al li, ke li kapablos plenumi per tiu forto tiajn aferojn, kiuj hieraŭ ankoraŭ estis ekster lia eblo. Iafoje li havis la impreson, kvazaŭ la malbono jam estus pasinta. Kiam la malespero resonadis ankoraŭ ĝeme en lia animo, li rememoradis tiun nokton kaj tiun sanktan, aĝan vizaĝon, levitan en preĝo al la ĉielo.

«Ne! Kristo ne rifuzos al Sia unua disĉiplo kaj al la paŝtisto de Sia ŝafaro! Kristo ne rifuzos al li, kaj mi ne ekdubos».

Kaj li kuris al la malliberejo, kiel anoncanto de bona novaĵo.

Sed tie renkontis lin neatendita malhelpo.

La pretoriaj gardoj, alternantaj ĉe la Mamertina malliberejo, ĉiuj jam konis lin kaj ordinare faris al li neniajn malfacilaĵojn, sed ĉi-foje la vico ne malfermiĝis, anstataŭe proksimiĝis al li centuriestro kaj diris:

— Pardonu, nobla tribunuso, hodiaŭ ni havas la ordonon neniun enlasi.

— Ci havas la ordonon? — ripetis Vinicio, paliĝante.

La soldato rigardis lin kun kompatato kaj respondis:

— Jes, sinjoro. La ordonon de la imperiestro. En la malliberejo estas multaj malsanuloj kaj eble oni timas, ke la vizitantoj disportos la malsanon tra la urbo.

— Sed ci diris, ke la ordono estas nur por hodiaŭ?

— Tagmeze la gardoj estas ŝanĝataj.

Vinicio eksilentis kaj malkovris la kapon, ĉar ŝajnis al li, ke la *pileolus*<sup>301</sup>, kiun li surhavis, estas el plumbo.

Subite la soldato proksimiĝis al li kaj diris per mallaŭta voĉo:

— Trankviliĝu, sinjoro. La gardistoj kaj Urso gardas ŝin.

Dirinte tion, li kliniĝis kaj en unu momento desegnis

<sup>301</sup> *pileolus* (lat.) — ĉapeto.

sur la ŝtona plato per sia longa gaŭla glavo la formon de fiŝo.

Vinicio ekrigardis lin vive.

— ... Kaj ci estas pretoriano?...

— Ĝis mi troviĝos tie, — respondis la soldato, montrante la malliberejon.

— Ankaŭ mi konfesas Kriston.

— Glorata estu lia nomo! Mi scias, sinjoro. Mi ne povas lasi cin en la malliberejon, se ci tamen skribos leteron, mi donos ĝin al la gardistoj.

— Dankon al ci, frato!...

Kaj, preminte la manon de la soldato, li foriris. La *pileolus* ĉesis pezi al li kiel plumbo. La matena suno leviĝis super la murojn de la malliberejo, kaj kune kun ĝia lumo kuraĝo denove komencis enflui la koron de Vinicio. Tiu soldato, kristano, estis por li kvazaŭ nova atesto de la potenco de Kristo. Post momento li haltis kaj, fiksinte la rigardon sur rozaj nubetoj, pendantaj super Kapitolo kaj super la templo de Statoro, li diris:

«Mi ne vidis ŝin hodiaŭ, Sinjoro, sed mi kredas je cia kompatemo.»

Hejme atendis lin Petronio, kiu, kiel ordinare, «ŝanĝante tagon en nokton», estis antaŭ nelonge reveninta. Li tamen sukcesis jam preni banon kaj ŝmiri sin antaŭ la

dormo.

— Mi havas por ci novaĵojn, — li diris. — Mi estis hodiaŭ ĉe Tulio Seneciono, kie estis ankaŭ la imperiestro. Mi ne scias kial, venis al la aŭgustino la ideo alkonduki kun si la malgrandan Rufrion ... Eble tial, ke li moligu per sia beleco la koron de la imperiestro. Malfeliĉe, la infano, laca kaj dormema endormiĝis dum la legado, kiel iam Vespaziano, kion vidante, Ahenobarbo ĵetis sur ĝin pokalon kaj grave vundis la knabon. Popea svenis, kaj ĉiuj aŭdis Neronon diri: «Mi havas jam sufiĉe ĉi tiun bastardon!» — kaj ci scias, ke tio signifas morton!

— La puno de Dio ekpendis super la aŭgustino, — respondis Vinicio, — sed kial ci tion rakontas al mi?

— Mi rakontas ĝin tial, ke vin kaj Ligian persekutis la kolero de Popea, kaj nun, okupite per sia malfeliĉo, ŝi eble forlasos la venĝon kaj lasos sin pacigi pli facile. Mi vidos ŝin hodiaŭ vespere kaj parolos kun ŝi.

— Dankon al ci. Ci anoncas al mi bonan novaĵon.

— Kaj ci banu cin kaj dormu. Cia buŝo estas violblua kaj restis el ci nur ombro.

Sed Vinicio demandis:

— Ĉu oni diris, kiam okazos la unua *ludus matutinus*?

— Post dek tagoj. Sed antaŭe oni malplenigos aliajn malliberejojn. Ju pli multe da tempo restos al ni, des pli

bone. Ne ĉio estas ankoraŭ perdita.

Kaj tiel parolante, li diris tion, kion li mem ne plu kredis, ĉar li sciis bonege, ke se Nerono, responde al la peto de Alituro, trovis la brile sonantan respondon, en kiu li komparis sin mem kun Bruto, tiam estas nenia savo por Ligia. Li ankaŭ kaŝis de Vinicio, kion li aŭdis ĉe Seneciono, ke Nerono kaj Tigeleno decidis elekti por si kaj por siaj amikoj la plej belajn kristanajn virgulinon kaj malvirgigi ilin antaŭ la morto, kaj la resto estis transdonota en la tago de la cirkoludo mem al pretorianoj kaj bestistoj.

Sciante, ke Vinicio en neniu okazo volos postvivi Ligian, li intence nutris dume la esperon en lia koro, unue pro kompatato al li kaj due, ĉar tiu ĉi estetikulo deziris ankaŭ, ke, se Vinicio devas morti, li mortu bela, ne kun vizaĝo mizeriĝinta kaj duonnigra de doloro kaj sendormeco.

— Mi diros hodiaŭ al la aŭgustino, — li diris, — pli malpli la jenon: savu Ligian por Vinicio, kaj mi savos por ci Rufrion. Ĉe Ahenobarbo unu vorto, dirita en konvena momento, povas iun savi aŭ pereigi. En malplej bona okazo ni gajnos iom da tempo.

— Dankon al ci, — ripetis Vinicio.

— Ci dankos min plej bone, se ci matenmanĝos kaj iras dormi. Je Ateno! Odiseo eĉ en plej granda malfeliĉo

pensis pri dormo kaj sonĝo. La tutan nokton ci certe pasigis en la malliberejo.

— Ne, — respondis Vinicio. — Mi volis iri nun en la malliberejon, sed estas ordonite, ke oni neniu enlasu. Eksciu ci, Petronio, ĉu la ordono estas nur por hodiaŭ, ĉu ĝis la tago de la cirkoludoj.

— Mi ekscios hodiaŭ nokte kaj morgaŭ matene mi diros al ci, por kiel longe kaj kial la ordono estas eldonita. Sed dume, eĉ se Helioso malsuprenirus pro ĉagreno en Kimerujon, mi iras dormi, kaj ci imitu min.

Kaj ili disiris, sed Vinicio iris en la bibliotekon kaj komencis skribi leteron al Ligia.

Kiam li finis, li portis ĝin mem kaj transdonis en la manojn de la kristana centestro, kiu tuj iris kun ĝi en la malliberejon. Post momento li revenis kun saluto de Ligia kaj kun la promeso, ke ankoraŭ hodiaŭ li reportos al li ŝian respondon.

Vinicio ne volis tamen reveni kaj, sidiĝinte sur rokpeco, atendis la leteron de Ligia. La suno leviĝis jam alten sur la ĉielon kaj tra la Deklivo Arĝenta fluis sur la Forumon, kiel ordinare, amasoj da homoj. Stratvendistoj anoncadis siajn komercaĵojn; aŭguristoj rekomendadis al la pasantoj siajn servojn; civitanoj gravpaŝe direktadis sin al Rostroj<sup>89</sup>, por aŭskulti hazardajn oratorojn aŭ rakonti al si

reciproke plej freŝajn novaĵojn. Laŭgrade, kiel la varmego brulis ĉiam pli forte, amasoj da senfaruloj rifuĝadis sub la portikojn de temploj, el sub kiuj elflugadis ĉiumomente tutaj aroj da kolomboj, brilante per siaj blankaj plumoj en la suna lumo kaj en la bluo.

Influante de la trolumo de la bruoj, varmo kaj senlima laceco, la okuloj de Vinicio komencis sin fermi. Monotonaj ekkrioj de knaboj, ludantaj apude moraon, kaj la egalritmaj paŝoj de la soldatoj lulis lin al dormo. Kelkfoje li levis ankoraŭ la kapon kaj prenis en la rigardon la malliber-egon, poste li apogis la frunton sur roka derompaĵo, ekĝemis, kiel infano endormiĝanta post longa plorado, kaj ekdormis.

Tuj eksvarmis ĉirkaŭ li vizioj. Ŝajnis al li, ke en nokto li portas en la brakoj Ligian tra nekonata vinberejo, kaj antaŭ li iras Pomponia Grecina kun meĉlampo, lumigante la vojon. Iu voĉo, kvazaŭ la voĉo de Petronio, vokis post li de malproksime: «Revenu!» sed li ne atentis tiun vokon kaj iris pluen post Pomponia, ĝis ili venis al kabano, sur kies sojlo staris Petro la apostolo. Tiam li montris al la apostolo Ligian kaj diris: «Ni venas el la areno, sinjoro, sed ni ne povas ŝin vekigi, ĉi veku ŝin.» Sed Petro respondis: «Kristo mem venos ŝin vekigi!»

<sup>89</sup> «**Rostroj** (hist.) Tribuno sur la Roma forumo, ornamita de ŝiprostroj» [PIV].

Poste la bildoj komencis miksi sin antaŭ liaj okuloj. Li vidis sonĝe Neronon kaj Popean, tenanta en la brakoj la malgrandan Rufrion kun sanganta frunto, kiun lavis Petronio, kaj Tigelenon, surŝutantan per cindro tablojn, kovritajn per multekostaj manĝaĵoj, kaj Vitelion, glutegantan tiujn manĝaĵojn, kaj multajn aliajn aŭgustanojn, sidantajn ĉe la festeno. Li mem kuŝis apud Ligia, sed inter la tabloj paŝis leonoj, de kies palflavaj barboj gutis sango. Ligia petis, ke li ŝin elkonduku, sed lin ekregis senforteco tiel granda, ke li ne povis eĉ moviĝi. Poste en liaj vizioj sekvis ĥaoso ankoraŭ pli granda, kaj fine ĉio profundigis en plenan mallumon.

El la profunda dormo vekis lin nur la suna brulego kaj la ekkrioj, kiuj eksonis tuj apud la loko, kie li sidis. Viniĉio frotis la okulojn: la strato svarmis je homoj, sed du kuristoj, vestitaj per flavaj tunikoj, dispuŝadis per longaj kanoj la amason, kriante kaj farante lokon por luksa portilo, kiun portis kvar egiptaj sklavoj.

En la portilo sidis homo, vestita per blanka vesto, kies vizaĝon oni ne povis vidi bone, ĉar tuj ĉe la okuloj li tenis papirusan rulaĵon kaj diligente ion legis.

— Lokon por la nobla aŭgustano! — kriis la kuristoj.

La strato estis tamen tiel svarmoplena, ke la portilo devis halti por momento. Tiam la aŭgustano mallevis sen-



pacience la paperrulaĵon kaj ŝovis la kapon eksteren, vokante:

— Dispelu tiujn ĉi sentaŭgulojn! Rapide!

Subite, rimarkinte Vinicion, li retiris la kapon kaj rapide levis al la okuloj la paperrulaĵon.

Kaj Vinicio ŝovis la manon sur la frunto, pensante ke li ankoraŭ songas.

En la portilo sidis Ĥilono.

Dume la kuristoj trabatis la vojon kaj la egiptoj estis ekmarŝontaj, kiam subite la juna tribunuso, kiu en unu momento, ekkomprenis multajn aferojn antaŭe por li nekompreneblajn, proksimiĝis al la portilo.

— Saluton al ci, Ĥilono! — li diris.

— Saluton, junulo, — fiere kaj digne respondis Ĥilono, penante doni al sia vizaĝo la esprimon de trankvileco, kiun li ne havis en la animo, — sed ne retenu min, ĉar mi rapidas al mia amiko, la nobla Tigeleno.

Sed Vinicio, kaptinte la randon de la portilo, klinis sin al li kaj, rigardante rekte en liajn okulojn, demandis per subpremita voĉo:

— Ĉu ci perfidis Ligian?...

— Koloso de Memnono! — ekkriis Ĥilono, terurite.

Sed en la okuloj de Vinicio ne estis minaco, do la timo de la greko pasis rapide. Li ekpensis, ke li estas sub la pro-

tekto de Tigeleno kaj de la imperiestro mem, tio estas de du potencoj, antaŭ kiuj ĉio tremas, kaj ke ĉirkaŭas lin fortaj sklavoj, dum Vinicio staras antaŭ li senarma, kun mizera vizaĝo kaj kun figuro fleksita de sufero.

Ĉe tiu ĉi penso revenis lia malhumileco. Li fiksas sur Vinicio siajn okulojn, ĉirkaŭitajn de inflama ruĝo, kaj reflustris:

— Kaj ci, kiam mi estis mortanta pro malsato, ordonis min skurĝi.

Dum momento ambaŭ silentis, post kio aŭdiĝis la obtuza voĉo de Vinicio.

— Mi estis maljusta al ci, Ĥilono!

Tiam la greko levis la kapon kaj, ekklakinte per la fingroj, kio estis en Romo signo de malestimo kaj malrespekto, respondis tiel laŭte, ke ĉiuj povu lin aŭdi:

— Amiko, se ci volas peti ion de mi, venu en mian domon sur Eskvilino en la matena tempo, kiam post bano mi akceptas gastojn kaj klientojn.

Li mansignis; je tiu gesto la egiptoj levis la portilon kaj la sklavoj, vestitaj per flavaj tunikoj, komencis voki, svingante la kanojn:

— Lokon por la portilo de la nobla Ĥilono Ĥilonido! Lokon! Lokon!...

## Ĉapitro 55<sup>a</sup>

En longa, rapide skribita letero, Ligia adiaŭis por ĉiam Vinicion. Ŝi sciis, ke al neniuj estas plu permesate veni en la malliberejon kaj ke ŝi povos vidi Vinicion nur el la areno. Tial ŝi petis lin, ke li informiĝu, kiam venos ilia vico, kaj ĉeestu la cirkoludon, ĉar ŝi deziras vidi lin ankoraŭfoje dum la vivo.

En ŝia letero estis sentebla nenia timo. Ŝi skribis, ke tiel ŝi, kiel la aliaj, sopiras jam la arenon, sur kiu ili trovas liberiĝon el la malliberejo. Esperante revenon de Pomponia kaj Aŭlo, ŝi petegis, ke venu ankaŭ ili. En ĉiu ŝia vorto oni sentis ekstazon, tiun apartiĝon de la vivo, en kiu vivis ĉiuj malliberigitaj, kaj kune neŝanceleblan kredon, ke la promesoj nepre estas plenumotaj trans la tombo.

«Ĉu Kristo min liberigos nun, ĉu post la morto, — ŝi skribis, — li min promesis al ci per la buŝo de la apostolo, sekve mi estas cia.» Kaj ŝi petegis lin, ke li ŝin ne priploru kaj ne lasu ekregi sin de doloro. La morto ne estis por ŝi neniigo de la ĵuroj. Kun la fido de infano ŝi certigis Vinicion, ke tuj post la martirigo sur la areno ŝi diros al Kristo, ke en Romo restis ŝia fianĉo, Marko, kiu sopiras al ŝi per la tuta koro. Kaj ŝi pensis, ke eble Kristo permesos al ŝia animo reveni al li por momento, por diri al li, ke ŝi vivas,

ke la mortsuferon ŝi ne memoras kaj ke ŝi estas feliĉa.

Ŝia tuta letero spiris feliĉon kaj grandegan esperon. Estis en ĝi nur unu peto, ligita kun la teraj aferoj: ke Vinicio prenu el la kadavrejo<sup>302</sup> ŝian korpon kaj enterigu ŝin kiel sian edzinon, en la tombo, en kiun li mem estis iam metota.

Kaj li legis tiun leteron kun disŝirita animo, sed kune ŝajnis al li neeble, ke Ligia pereu de la dentegoj de sovaĝaj bestoj kaj ke Kristo ne elmontru al ŝi kompaton. Sed ĝuste en tio estis ankaŭ espero kaj fido. Reveninte hejmen, li reskribis, ke ĉiutage li venados al la muroj de Tulianumo kaj atentos, ĝis Kristo polvigos la murojn kaj redonos ŝin al li. Li ordonis al ŝi kredi, ke li, Kristo, povas redoni ŝin al li eĉ el la cirko, ke la granda apostolo petegas lin pri tio kaj ke la momento de liberiĝo estas proksima. La konvertita centuriestro devis porti al ŝi en la sekvonta tago tiun leteron.

Sed kiam en la sekvinta tago Vinicio venis al la malliberejo, la centuriestro, forlasinte la vicon, proksimiĝis al li unua kaj diris:

— Aŭskultu min, sinjoro. Kristo, kiu cin suferprovis, montris al ci Sian favoron. Hodiaŭ nokte venis liberigitoj de la imperiestro kaj de la prefekto, por elekti al ili krista-

<sup>302</sup> Latine *spoliarium* — ejo kie oni senvestigis mortigitajn gladiatorojn.

najn virgulinon por malhonorigo; ili demandis pri cia fianĉino, sed la Sinjoro sendis sur ŝin febron, de kiu mortas la malliberigitoj en Tulianumo, kaj ili lasis ŝin. Hieraŭ vespere ŝi estis jam senkonscia, kaj benata estu la nomo de la Savinto, ĉar tiu ĉi malsano, kiu ŝin savis de la malhonoro, povas ŝin savi ankaŭ de la morto.

Vinicio apogis la manon sur la surŝultraĵon de la soldato por ne fali, kaj tiu ĉi parolis plu:

— Danku la kompatemon de la Sinjoro. Linon oni kaptis kaj transdonis al torturistoj, sed vidante ke li agonias, oni lin redonis. Eble ankaŭ ŝin oni nun redonos al ci, kaj Kristo ŝin resanigos.

La juna tribunuso restis ankoraŭ momente kun mallevita kapo, poste li levis ĝin kaj diris mallaŭte:

— Jes, centestro. Kristo, kiu savis ŝin de la malhonoro, savos ŝin de la morto.

Kaj, sidinte ĉe la mallibereja muro ĝis la vespero, li revenis hejmen por sendi siajn sklavojn, ke ili prenu Linon kaj transportu lin en unu el liaj apudurbaj vilaoj.

Petronio tamen, eksciinte pri ĉio, decidis agi ankoraŭ. Jam antaŭe li estis ĉe la aŭgustino, kaj nun li iris al ŝi refoje. Li trovis ŝin ĉe la lito de la malgranda Rufrio. La infano kun vundita kapo deliris en febro kaj la patrino penis ĝin savi kun malespero kaj teruro en la koro, pensante,

ke eble ŝi savos ĝin por tio, ke ĝi pereu baldaŭ en pli terura maniero.

Okupite ekskluzive per sia doloro, ŝi ne volis eĉ aŭdi pri Vinicio kaj Ligia, sed Petronio teruris ŝin.

— Ci ofendis, — li diris al ŝi, — novan kaj nekonatan dion. Ci, aŭgustino, konfesas laŭdire la hebrean Jehovon, sed la kristanoj asertas, ke Kristo estas lia filo, pensu do, ĉu cin ne persekutas la kolero de la patro. Kiu scias, ĉu tio, kio cin trafis, estas ilia venĝo, kaj ĉu la vivo de Rufrio dependas de tio, kiel ci agos?

— Kion ci volas, ke mi faru? — demandis kun timo Po-pea.

— Elpetu pardonon de la ofenditaj dioj.

— Kiel?

— Ligia estas malsana. Influu la imperiestron aŭ Tigelenon, ke oni redonu ŝin al Vinicio.

Kaj ŝi demandis kun malespero:

— Ĉu ci pensas, ke mi tion povas?

— Sed ci povas ion alian. Se Ligia resaniĝos, ŝi devos morti sur areno. Iru en la templon de Vesto kaj postulu, ke *virgo magna* troviĝu hazarde apud Tulianumo en la momento, kiam la malliberigitaj estos elkondukataj al morto, kaj ke ŝi ordonu liberigi tiun knabinon. La granda pastrino ne rifuzos ĝin al ci.

— Kaj se Ligia mortos pro la febro?

— La kristanoj diras, ke Kristo estas venĝema, sed justa; eble ci akiros lian pardonon per la intenco mem.

— Li donu al mi iun signon, ke li savos Rufrion.

Petronio movis la ŝultrojn.

— Mi ne venas kiel lia sendito, ho dia, mi nur diras al ci: estu prefere en paco kun ĉiuj dioj romaj kaj fremdaj.

— Mi iros, — diris Popea per rompita voĉo.

Petronio ekspiris profunde.

«Fine mi ion efikis», li ekpensis.

Kaj, reveninte al Vinicio, li diris al la juna tribunuso:

— Petu cian Dion, ke Ligia ne mortu pro febro, ĉar se ŝi ne mortos, la Granda vestalo ordonos ŝin liberigi. La aŭgustino mem petos ŝin pri tio.

Vinicio rigardis lin per okuloj, en kiuj brilis febro, kaj respondis:

— Ŝin liberigos Kristo.

Kaj Popea, kiu estis preta, por savi Rufrion, bruloferi hekatombojn al ĉiuj dioj de la mondo, en la sama vespero ankoraŭ iris Forumon, al la vestaloj, konfidinte la malsanan infanon al la zorgado de fidela vartistino, Silvia, kiu iam ankaŭ ŝin vartis.

Sed sur Palatino verdikto je la infano estis jam eldonita, ĉar apenaŭ la portilo de la imperiestrino malaperis

post la Granda pordego, en la ĉambron, kie kuŝis la malgranda Rufrio, eniris du liberigitoj de la imperiestro, el kiuj unu ĵetis sin sur la maljunan Silvian kaj ŝtopis ŝian buŝon, kaj la alia, kaptinte bronzan statueton de la sfinkso, senkonsciigis ŝin per la unua ekbato.

Poste ili proksimiĝis al Rufrio. La knabo, konsumata de febro kaj senkonscia, ne komprenante, kio okazas ĉirkaŭ li, ridetis al ili kaj fermetis siajn belegajn okulojn, kvazaŭ li penus ilin rekoni. Sed ili, depreninte de la vartistino zonon, nomatan *cingulum*, bantligis ĝin ĉirkaŭ lia kolo kaj kuntiris. La infano, vokinte foje la patrinon, mortis facile. Poste ili envolvis ĝin en la littukon kaj, eksidinte sur pretigitajn ĉevalojn, ekrapidis for, al Ostio, kie ili ĵetis la korpon en la maron.

Popea, ne trovinte la Grandan virgulinon, kiu kune kun la aliaj vestaloj estis ĉe Vatinio, revenis baldaŭ Palatinon. Trovinte la malplenan liton kaj la malvarmiĝintan korpon de Silvia, ŝi svenis, kaj kiam oni ŝin rekonsciigis, ŝi komencis krii kaj ŝiaj sovaĝaj krioj sonis dum la tuta nokto kaj dum la sekvinta tago.

Sed en la tria tago Nerono ordonis al ŝi veni al festeno, do, vestinte sin per ametista tuniko, ŝi venis kaj sidis kun ŝtonsimila vizaĝo, orhara, belega kaj malserena, kiel la anĝelo de morto.



## Ĉapitro 56<sup>a</sup>

Antaŭ ol la Flavioj starigis Koloseon, oni konstruadis la amfiteatrojn en Romo plejparte el ligno, kaj tial preskaŭ ĉiuj forbrulis en la fajrego. Nerono tamen, por aranĝi la promesitajn cirkoludojn, ordonis starigi kelkajn novajn kaj inter ili unu grandegan, por kies konstruo oni komencis, tuj post la estingo de la fajro, venigi per la maro kaj Tibero potencajn arbotrunkojn, dehakitajn sur la deklivoj de Atlaso. Ĉar la ludoj devis superi ĉiujn antaŭajn per sia brileco kaj nombro de viktimoj, oni aldonis vastajn tenejojn por la homoj kaj bestoj. Miloj da metiistoj laboris ĉe la konstruado tage kaj nokte. Oni konstruis kaj ornamis senripoze. La popolo rakontis al si mirindaĵojn pri la apogoj, inkrustitaj per bronzo, sukceso, eburo, perlamoto kaj ŝelo de transmaraj testudoj. Kanaloj, kondukitaj laŭlonge de la vicoj, plenigotaj per glacia akvo, celis konservi en la konstruaĵo agrablan malvarmon eĉ dum plej brula vetero. Grandega purpura velario ŝirmis kontraŭ la sunradioj. Inter la vicoj oni starigis incensilojn por bruligi arabajn aromaĵojn; supre oni lokis aparatojn surŝprucontajn la spektantojn per safrana akvo kaj verbena. La famaj arĥitektoj, Severo kaj Celero, streĉis sian tutan scion por starigi amfiteatron senkomparan kaj kune povantan enteni tian

nombron da scivoluloj, kian povis ĝis nun enteni neniu el la konataj amfiteatroj.

Tial do en la tago, en kiu devis komenciĝi la unua *ludus matutinus*, amaso da popolo atendis de la tagiĝo la malfermon de la pordegoj, aŭskultante kun plezuro la muĝadon de leonoj, la raŭkan blekadon de panteroj kaj la hurladon de hundoj. Al la bestoj oni donis de du tagoj nenion por manĝi, anstataŭe oni traŝovadis antaŭ iliaj okuloj sangajn pecojn da viando, por tiom pli eksciti ilian furiozon kaj malsaton. Ifoje ektondradis tia uragano da sovaĝaj voĉoj, ke la homoj, starantaj antaŭ la cirko, ne povis interparoli, kaj la pli impresiĝemaj paliĝadis pro timo. Je la sunleviĝo tamen eksonis interne de la cirko kantoj laŭtaj, sed trankvilaj, kiujn oni aŭskultis kun miro, ripetante unu al alia: «La kristanoj! La kristanoj!» Vere, multnombrajn arojn da ili oni venigis nokte ankoraŭ en la amfiteatron, kaj ne nur el unu malliberejo, kiel oni intencis komence, sed poparte el ĉiuj. Oni sciis en la amaso, ke la cirkoludoj daŭros dum tutaj semajnoj kaj monatoj, sed oni disputis, ĉu kun tiu parto de la kristanoj, kiu estis destinita por hodiaŭ, oni sukcesos fini en la daŭro de unu tago. La viraj, virinaj kaj infanaj voĉoj, kantantaj la matenan kanton, estis tiel multaj, ke spertuloj opiniis, ke, eĉ se oni sendados sur la arenon po ducent aŭ tricent homoj, la

bestoj laciĝos, satiĝos kaj ĝis la vespero ne povos ĉiujn disŝiri. Aliaj asertis, ke tia granda nombro da viktimoj, aperantaj samtempe sur la areno, distras la atenton kaj ne lasas konvene ĝui la spektaklon.

Laŭgrade kiel proksimiĝadis la momento, en kiu oni devis malfermi la koridorojn, nomatajn *vomitorioj*, kondukantajn internen, la popolo iĝadis pli vigla, pli gaja kaj diskutis pri diversaj aferoj, koncernantaj cirkoludojn. Komencis formi sin partioj, laŭdantaj pli grandan lertecon de leonoj aŭ de tigroj en disŝirado de homoj. Tie kaj ie oni intervetis. Aliaj parolis tamen pri la gladiatoroj, kiuj estis ludontaj sur la areno antaŭ la kristanoj, kaj denove formiĝadis partioj jen de samnitoj, jen de gaŭloj, jen de mirmilonoj, jen de tracoj, jen de retistoj. Pli aŭ malpli grandaj iliaj taĉmentoj, kondukataj de majstroj, nomataj *lanistæ*, frumatene komencis enflui la amfiteatron. Ne volante laciĝi antaŭtempe, ili marŝis sen armiloj, ofte tute nudaj, ofte kun verdaj branĉoj en la manoj, aŭ kronitaj per floroj, junaj, belegaj en la matena lumo kaj plenaj je vivo. Iliaj korpoj, brilantaj de olivoleo, potencaj, kvazaŭ skulptitaj el marmoro, vekadis admiron de la popolo, kiu amegis la belajn formojn. Multajn el ili oni konis persone kaj ĉiunmomente aŭdiĝadis la ekkrioj: «Saluton, Furnio! Saluton, Leo! Saluton, Maksimo! Saluton, Diomedo!» Junaj knabi-

noj levadis al ili okulojn plenajn je amo, kaj ili serĉis rigarde, kiu estas la plej bela, kaj parolis al ili per ŝercaj vortoj, kvazaŭ neniu zorgo pezus super ili, sendante mankisojn aŭ vokante: «Karesu, antaŭ ol la morto min karesos!» Poste ili malaperadis en la pordegoj, el kiuj multaj estis neniam reelirontaj. Sed ĉiam novaj kaŭzoj distris la atenton de la amaso. Post la gladiatoroj iris *mastigoforoj*, t.e. homoj armitaj per vipoj, kies devo estis vipi kaj stimuli la batalantojn. Poste muloj tiris al la kadavrejo tutajn vicojn da veturiloj, sur kiuj estis metitaj amasoj da lignaj ĉerkoj. Je tiu vido ĝojis la popolo, konjektante el ilia nombro pri la grandeco de la spektaklo. Plue paŝis homoj, kiuj devis finmortigi la vunditojn, alivestitaj tiel, ke ĉiu similis al Ĥarono aŭ al Merkuro, poste homoj gardantaj ordon en la cirko, disdonantaj la sidlokojn, poste sklavoj disportantaj manĝaĵojn kaj malvarmajn trinkaĵojn, fine pretorianoj, kiujn ĉiu imperiestro ĉiam havis apude en amfiteatro.

Oni malfermis fine la *vomitoriojn* kaj la amasoj ĵetegis sin internen. Sed tiel multegaj estis la alvenintoj, ke ili fluis kaj fluis dum tutaj horoj kaj mirinde eĉ estis, ke la amfiteatro povas engluti tiel sennombran homamason. La muĝoj de la bestoj, flarantaj la homajn odorojn, plifortiĝis ankoraŭ. La popolo bruegis en la cirko, okupante la lokojn, kiel ondo dum ventego.

Venis fine la urboprefekto, ĉirkaŭita de *vigiloj*, kaj post li en jam senrompa vico komencis ŝanĝi sin la portiloj de la senatanoj, konsuloj, pretoroj, ediloj<sup>303</sup>, oficistoj publikaj kaj palacaj, pretoriaj ĉefuloj, patricioj kaj elegantaj virinoj. Kelkajn portilojn antaŭkuris liktoroj, portantaj hakilojn meze de vergofaskoj, aliajn – amasoj da sklavoj. En la suno flagris la orumaĵoj de la portiloj, blankaj kaj diverskoloraj vestoj, plumoj, orelringoj, juveloj, la ŝtalo de la hakiloj. El la cirko aŭdiĝadis ekkrioj, per kiuj la popolo salutis la potencajn altrangulojn. De tempo al tempo alvenadis ankoraŭ negrandaj taĉmentoj da pretorianoj.

Sed la pastroj el diversaj temploj alvenis iom pli malfrue, kaj nur post ili oni portis la sanktajn virgulinon de Vesto, kiujn antaŭiris liktoroj. Por komenci la spektaklon oni atendis jam nur la imperiestron, kiu, ne volante atendi la popolon tro longe kaj dezirante favorigi ĝin al si per rapidemo, baldaŭ alvenis, akompanate de la aŭgustino kaj aŭgustanoj.

Petronio venis inter la aŭgustanoj, havante en sia portilo Vinicion. La juna tribunuso sciis, ke Ligia estas malsana kaj senkonscia; sed ĉar en la lastaj tagoj la aliro al la malliberejo estis severe gardata, kaj ĉar la antaŭajn postenantojn oni anstataŭigis per novaj, al kiuj estis malper-

<sup>303</sup> **edilo** — oficisto zorganta pri konstruaĵoj kaj ordo en la urbo; «(hist.) Roma magistratano» [NPiV].

mesite paroli kun la gardistoj, same kiel doni plej etajn informojn al tiuj, kiuj venadis demandi pri la malliberigit-oj, tial li ne estis certa, ĉu ŝi trovas sin inter la viktimoj, destinitaj por la unua tago de la spektakloj. Por leonoj oni povus sendi ŝin ankaŭ malsana, eĉ senkonscia. Sed ĉar la viktimoj estis ĉirkaŭkudrotaj per bestaj feloj kaj sendotaj grandare sur la arenon, tial neniu spektanto povus rimarki, ĉu unu pli aŭ malpli estas inter ili, nek iun rekoni. La gardistoj kaj la tuta amfiteatra servistaro estis subaĉetita, kaj kun la bestistoj oni interkonsentis, ke ili kaŝos Ligian en iu malluma angulo de la amfiteatro, kaj nokte transdonos ŝin en la manojn de farmisto de Vinicio, kiu tuj forveturigos ŝin en la Albanan montaron. Petronio, al kiu Vinicio konigis la sekreton, konsilis al la juna tribunuso, ke li iru malkaŝe kun li en la amfiteatron kaj nur ĉe la eniro elŝtelu sin en la interpremo kaj rapidu en la ĉelojn, kie, por eviti eblajn erarojn, li devis mem montri al la gardistoj Ligian.

La gardistoj enlasis lin tra malgranda pordeto, tra kiu ili mem eniradis. Unu el ili, nomata Siro, kondukis lin senprokraste al la kristanoj. Envoje li diris al Vinicio:

— Mi ne scias, sinjoro, ĉu ci trovos tiun, kiun ci serĉas. Ni demandis pri junulino, nomata Ligia, sed neniu donis al ni respondon. Povas esti, ke ili ne fidas al ni.

- Ĉu ili estas multaj? — demandis Vinicio.
- Multaj el ili, sinjoro, devos resti por morgaŭ.
- Ĉu estas inter ili malsanuloj?
- Tiaj, kiuj ne povas stari sur la piedoj, ne estas.

Dirinte ĉi tion, Siro malfermis la pordon kaj ili eniris kvazaŭ en grandegan ĉambron, sed malaltan kaj malluman, ĉar la lumo eniĝadis tien sole tra kraditaj malfermaĵoj, apartigantaj ĝin de la areno. Vinicio povis komence nenion vidi, li aŭdis nur en la ejo murmuradon de voĉoj kaj ekkriojn de la popolo, atingantajn lin el la amfiteatro.

Sed post momento, kiam liaj okuloj alkiutimiĝis al la krepusko, li ekvidis tutajn arojn da strangaj estaĵoj, similaj al lupoj kaj ursoj. Tio estis la kristanoj, ĉirkaŭkudritaj per bestaj feloj. Unuj el ili staris, aliaj preĝis, genuante. Tie kaj ie laŭ longaj haroj, malsuprenfalantaj sur la felo, oni povis ekkoni, ke la viktimo estis virino. Patrinoj, similaj al lupinoj, portis en la brakoj siajn infanojn, ankaŭ vile ĉirkaŭkudritajn. Sed el sub la feloj vidiĝadis vizaĝoj lumaj, la okuloj en la krepusko brilis de ĝojo kaj de febro. Videble estis, ke pliparton de tiuj homoj regas unu penso, ekskluziva kaj transmonda, kiu jam dum la vivo sensentigis ilin al ĉio, kio okazis ĉirkaŭ ili kaj kio povis ilin renkonti. Kelkaj, demandataj de Vinicio pri Ligia, rigardis lin per okuloj kvazaŭ vekitaj el dormo, ne respondante la de-

mandojn; aliaj ridetis al li, metante la fingrojn sur la buŝojn aŭ montrante la ferajn kradojn, tra kiuj fluis faskoj da brilo. Infanoj nur ploris kelkloke, timigitaj per la muĝado de la bestoj, hurlado de la hundoj, kriado de la popolo kaj per la bestosimilaj figuroj de siaj gepatroj.

Vinicio, irante apud Siro la gardisto, rigardis la vizaĝojn, serĉis, demandis, iafoje falpuŝiĝadis pro la korpoj de tiuj, kiuj svenis pro interpremo, sufoka aero kaj varmegeco, kaj li trapuŝadis sin pluen en la malluman fundon de la ejo, kiu ŝajnis tiel vasta, kiel la tuta amfiteatro.

Sed subite li haltis, ĉar ŝajnis al li, ke proksime de la krado eksonis konata al li voĉo. Aŭskultinte dum momento, li turniĝis kaj, trapuŝinte sin tra la amaso, ekstaris proksime. Fasko da lumo falis sur la kapon de la parolanto kaj en tiu brilo Vinicio rekonis en lupa felo la malgrasan kaj senindulgan vizaĝon de Krispo.

— Pentu pro viaj pekoj, — parolis Krispo, — ĉar la momento tuj venos. Sed kiu pensas, ke per la sola morto li liberiĝos de siaj kulpoj, tiu novan pekon plenumas kaj estos ĵetita en la eternan fajron. Per ĉiu via peko, kiun vi plenumis dum la vivo, vi renovigadis la mortsuferojn de la Sinjoro, kiel do vi aŭdacas esperi ke tiu sufero, kiu vin atendas, povas egali la lian? Per egala morto pereos hodiaŭ justuloj kaj pekuloj, sed la Sinjoro distingos siajn meri-



titojn. Ve al vi, ĉar la leonaj dentegoj disŝiros viajn korp-  
ojn, sed ne disŝiros viajn kulpojn, nek viajn kalkulojn kun  
Dio. La Sinjoro elmontris sufiĉe da kompatemo, kiam li  
permesis najli sin al la kruco, sed de nun li estos nur juĝ-  
isto, kiu neniun kulpon lasos senpune. Do vi, kiuj pensis,  
ke per martireco vi neniigos viajn pekojn, blasfemas kon-  
traŭ la Dia justeco kaj tiom pli profunda abismo vin aten-  
das. Finiĝis la kompatemo kaj venis la tempo de la Dia  
kolero. Jen vi ekstaros post momento antaŭ la terura juĝo,  
antaŭ kiu apenaŭ virtulo saviĝas. Pentu pro viaj pekoj,  
ĉar malfermitaj estas la inferaj senfundaĵoj kaj ve al vi,  
edzoj kaj edzinoj, ve al vi, gepatroj kaj infanoj!

Kaj etendinte la ostajn manojn, li skuis ilin super la  
klinitaj kapoj, sentima, sed ankaŭ senkompata eĉ antaŭ la  
morto, al kiu post momento devis iri ĉiuj tiuj kondamnit-  
oj. Post liaj vortoj aŭdiĝis la voĉoj: «Ni pentu pro niaj pe-  
koj!», poste sekvis silento kaj oni aŭdis nur ploron de in-  
fanoj kaj batadon de manoj sur la brustoj.

Kaj al Vinicio la sango koagulis en la vejnoj. Li, kiu  
sian tutan esperon bazis sur la kompatemo de Kristo, ek-  
aŭdis nun, ke venis la tago de kolero kaj ke kompaton ne  
havigos eĉ morto sur la areno. Trakuris, vere, lian kapon  
penso luma kaj rapida, kiel fulmo, ke Petro la apostolo  
alie parolus al tiuj ĉi mortontoj, malgraŭ tio tamen la se-

veraj, plenaj je fanatikeco vortoj de Krispo, kaj ĉi tiu mal-luma ejo kun kradoj, post kiu estis la kampo de martireco, kaj ĝia proksimeco kaj la amasego de la viktimoj, vestitaj jam por la morto, plenigis lian animon per teruro kaj timo. Ĉio tio kune ŝajnis al li pli terura kaj pli monstra ol la plej sangaj bataloj, kiujn li partoprenis. La malbonaero kaj varmegeco komencis lin sufoki. Malvarma ŝvito aperis sur lia frunto. Ekkaptis lin timo, ke li svenos, kiel tiuj, pro kies korpoj li falpuŝiĝadis dum sia serĉado en la fundo de la ejo, kiam do li ekpensis krome, ke ĉiumomente oni povas malfermi la kradojn, li komencis laŭte voki Ligian kaj Urson, esperante, ke se ne ili mem, respondos al li iu, kiu ilin konas.

Efektive, tuj iu homo, alivestita kiel urso, ektiris lin je la togo kaj diris:

— Sinjoro, ili restis en la malliberejo. Min oni elkondukis laste kaj mi vidis ŝin malsana sur la kuŝejo.

— Kiu ci estas? — demandis Vinicio.

— La fosisto, en kies kabano la apostolo baptis cin, sinjoro. Oni malliberigis min antaŭ tri tagoj, kaj hodiaŭ mi jam mortos.

Vinicio ekspiris. Enirante ĉi tien, li deziris trovi Ligian, nun tamen li estis preta danki al Kristo, ke ŝi ne estas ĉi tie, kaj vidi en tio signon de lia kompatemo.

Dume la fosisto ektiris lin duafoje je la togo kaj diris:

— Ĉu ci memoras, sinjoro, ke mi kondukis cin en la Kornelian vinberejon, kie en la budo predikis la apostolo?

— Mi memoras, — respondis Vinicio.

— Mi vidis lin poste tagon antaŭ ol oni min malliberigis. Li benis min kaj diris, ke li venos en la amfiteatron por krucosigni la pereantojn. Mi volus rigardi lin en la momento de la morto kaj vidi la signon de kruco, ĉar tiam pli facile estos al mi morti, se do ci scias, sinjoro, kie li estas, diru al mi.

Vinicio mallaŭtigis la voĉon kaj respondis:

— Li estas inter la servistoj de Petronio, alivestita kiel sklavo. Mi ne scias, kie ili elektis la lokojn, sed mi revenos en la cirkon kaj vidos. Rigardu min, kiam ci eliros la arenon, kaj mi leviĝos kaj turnos la kapon en ilian flankon. Tiam ci trovos lin per la okuloj.

— Dankon al ci, sinjoro, kaj pacon al ci.

— Estu al ci la Savinto kompatema.

— Amen.

Vinicio eliris el la tunelo kaj iris la amfiteatron, kie li havis lokon apud Petronio, meze de la aliaj aŭgustanoj.

— Ĉu ci trovis ŝin? — demandis lin Petronio.

— Ne. Ŝi restis en la malliberejo.

— Aŭskultu, kio venis ankoraŭ en mian penson, sed

aŭskultante, rigardu, ekzemple, Nigidian, por ke ŝajnu, ke ni parolas pri ŝia kombaĵo ... Tigeleno kaj Hîlono rigardas nin ĉi-momente ... Aŭskultu do: oni metu Ligian nokte en ĉerkon kaj elportu ŝin el la malliberejo, kiel mortintan; la ceteron ci divenas.

— Jes, — respondis Vinicio.

La pluan interparolon rompis al ili Tulio Seneciono, kiu, kliniĝinte al ili, demandis:

— Eble vi scias, ĉu oni donos armilojn al la kristanoj?

— Ni ne scias, — respondis Petronio.

— Mi preferus, ke oni donu, — diris Tulio, — alie la areno tro baldaŭ iĝas simila al buĉejo. Sed kia belega amfiteatro!

Efektive, la vidaĵo estis impona. La malpli altaj vicoj, plenegaj je togoj, blankis, kiel neĝo. En la orumita podio sidis la imperiestro, ornamita per diamanta kolĉeno, kun ora florkrono sur la kapo, apud li la belega kaj malserena aŭgustino, apude, ambaŭflanke, la vestaloj, altaj oficistoj, senatanoj en borderitaj vestoj, militistaj ĉefuloj en brilantaj armaĵoj, unuvorte ĉiu, kiu estis en Romo potenca, brila kaj riĉa. En la pluaj vicoj sidis kavaliroj, kaj pli alte nigris ronde maro da homaj kapoj, super kiuj de la kolonoj pendis girlandoj, plektitaj el rozoj, lilioj, anemonoj, hederoj kaj vinberbranĉoj.

La popolo interparolis laŭte, voksignis, kantis, iafoje eksplodadis per rido pro iu sprita vorto, kiun oni komunikadis al si reciproke de vico al vico, kaj piedfrapis pro senpacienco, por plirapidigi la spektaklon.

Fine la piedfrapado iĝis simila al tondro kaj senĉesa. Tiam la urboprefekto, kiu jam antaŭe ĉirkaŭrajdis la arenon kun sia brila sekvantaro, donis signon per tuko, al kio respondis en la amfiteatro ia ĝenerala: «Aaa!...» elŝirita el miloj da brustoj.

Ordinare oni komencadis la spektaklojn per ĉasado je sovaĝaj bestoj, en kio majstris diversaj barbaroj el la nordo kaj sudo, ĉi-foje tamen devis esti eĉ tro da bestoj, oni komencis do per *andabatæ*,<sup>304</sup> t.e. homoj, vestitaj per kaskoj sen okultruoj, kiuj sekve batalis blinde. Kelkdeko da ili, enirinte samtempe la arenon, komencis svingi glavojn en la aero, kaj *mastigoforoj* per longaj forkegoj puŝis ilin unun al alia, por ke ili renkontiĝu. La eleganta publiko rigardis indiferece kaj malrespekte similan spektaklon, sed la popolon amuzis la mallertaj movoj de la luktistoj, kaj se okazis, ke ili renkontiĝis dors-al-dorse, ĝi eksplodadis per laŭta rido, vokante: «dekstren!» «maldekstren!» «rekten!» kaj ofte intence erarigante la kontraŭulojn. Kelkaj paroj tamen kunkroĉiĝis kaj la batalo komen-

---

<sup>304</sup> Voĉlegu [andabate].

cis esti sanga. La pli obstinaj luktistoj ĵetis la ŝildojn kaj, doninte al si reciproke la maldekstrajn manojn por ne plu disiĝi, per la dekstraj batalis pro vivo aŭ morto. Kiu falis, levis la fingrojn supren, petegante per tiu signo kompaton, sed en la komenco de spektaklo la popolo insistis ordinar morton de la vunditoj, precipe se koncernataj estis *andabatae*, kiuj, havante la vizaĝojn kovritaj, restis al ĝi nekonataj. Iom post iom la nombro de la batalantoj malgrandiĝadis, kaj kiam fine restis nur du, oni puŝis ilin unun al la alia tiel, ke renkontiĝinte, ili falis sur la sablon kaj sur ĝi mortpikis sin reciproke. Tiam meze de la ekkrioj «finite!»<sup>305</sup> cirkaj servistoj forigis la kadavrojn, post kio servoknabetoj forrastis la freŝajn signojn sur la areno kaj surŝutis ĝin per safranaj folioj.

Nun devis sekvi pli serioza batalo, ekscitanta la interenson ne nur de la popolamaso, sed ankaŭ de la eleganta publiko, dum kiu junaj patricioj faradis grandegajn vetojn, ofte malgajnante ĉion ĝis la lasta monero. Tuj komencis rondiri el manoj en manojn tabuletoj, sur kiuj oni enskribadis la nomojn de favoratoj kaj kune la nombron de sestercoj, kiun ĉiu vetodonis pro sia elektito. La *spectati*, t.e. luktistoj, kiuj batalis jam sur areno kaj triumfis sur ĝi, ricevadis plej multe da partianoj, sed inter la ludantoj

---

<sup>305</sup> *Peractum est.*

estis ankaŭ tiaj, kiuj vetodonis konsiderindajn sumojn por gladiatoroj novaj kaj nekonataj, esperante, ke en la okazo de ilia venko ili enpoŝigos grandegajn gajnojn. Vetis eĉ Nerono kaj la pastroj kaj la vestaloj kaj la senatanoj kaj la kavaliroj kaj la popolo. La plebanoj, se mankis al ili mono, vetodonis ofte la propran liberecon. Oni do atendis kun batantaj koroj, eĉ kun timo, la aperon de la luktistoj kaj pluraj faris laŭtajn ĵurpromesojn al la dioj por certigi ilian protekton al sia favorato.

Efektive, kiam aŭdiĝis la timigaj sonoj de la trumpetoj, en la amfiteatro ekregis la silento de atendo. Miloj da okuloj direktis sin al la granda pordego, al kiu proksimiĝis homo, alivestita kiel Ĥarono, kaj meze de la ĝenerala silento frapis ĝin trifoje per martelo, kvazaŭ vokante al morto tiujn, kiuj estis post ĝi kaŝitaj. Poste malfermiĝis malrapide ambaŭ duonoj de la pordego, montrante nigran faŭkon, el kiu sur la luman arenon komencis eliri la gladiatoroj. Ili iris taĉmente, po dudek kvin homoj, aparte tracoj, aparte mirmilonoj, samnitoj, gaŭloj, ĉiuj peze armitaj, kaj fine retistoj, tenantaj en unu mano reton, en la alia tridenton. Je ilia vido tie kaj ie sur la benkoj aŭdiĝis aplaŭdoj, kiuj baldaŭ ŝanĝis sin en unu grandan kaj daŭran uraganon. De supre ĝis malsupre oni vidis brilantajn vizaĝojn, aplaŭdantajn manojn kaj buŝojn, el kiuj eliĝadis

ekkrioj. Ili dume ĉirkaŭiris la tutan arenon per paŝo egal-ritma kaj elasta, flagrante per glavoj kaj riĉaj armaĵoj, poste haltis antaŭ la imperiestra podio, fieraj, trankvilaj kaj brilaj. Akra sono de korno silentigis la aplaŭdojn; tiam la luktistoj etendis supren la dekstrajn brakojn kaj levante la okulojn kaj la kapojn al Nerono, komencis elkrii, aŭ pli ĝuste, kanti per tiriĝemaj voĉoj:

*Ave, cæsar imperator!*  
*Morituri te salutant.*<sup>306</sup>

Poste ili rapide diskuris, okupante apartajn lokojn ĉe la rando de la areno. Ili devis ataki sin reciproke en tutaj taĉmentoj, sed antaŭe oni permesis al la plej famaj luktistoj renkontiĝi en serio da duopaj bataloj, en kiuj plej bone elmontriĝadis la forto, lerteco kaj kuraĝo de la kontraŭuloj. Tuj efektive el inter la gaŭloj elpaŝis luktisto, bone konata al amantoj de amfiteatro sub la nomo «Buĉulo», venkinto en multaj cirkoludoj. Kun granda kasko sur la kapo, en kiraso kuprokovranta de antaŭe kaj malantaŭe lian potencon bruston, li aspektis en la helo de la flava areno, kiel grandega, brilanta skarabo. Ne malpli glora retisto Kalendio elpaŝis kontraŭ lin.

Inter la spektantoj oni komencis veti:  
 — Kvincent sestercojn pro la gaŭlo!

<sup>306</sup> Saluton Cezaro, armeestro! Mortontoj cin salutas!



- Kvincent pro Kalendio!
- Je Herkulo! Mil!
- Du mil!

Dume la gaŭlo, veninte ĝis la mezo de la areno, komencis repaŝi kun alcelita glavo kaj, levante la kapon, rigardis atente la kontraŭulon tra la okultruoj de la viziero, dum la facila, belforma kaj statusimila retisto, tute nuda, krom zonaĵo sur la koksoj, ĉirkaŭiradis rapide la pezan malamikon, gracie svingante la reton, levante aŭ mallevante la tridenton kaj kantante la kutiman kanton de la retistoj:

*Ne cin, ĉasas mi nur fiŝon,  
Ne forkuru, gaŭlo!*<sup>307</sup>

Sed la gaŭlo ne forkuris, ĉar post momento li haltis kaj, ekstarinte loke, komencis turni sin per apenaŭ rimarkeblaj movoj, por ĉiam havi la malamikon antaŭe. En lia figuro kaj monstre granda kapo estis io terura. La spektantoj bonege komprenis, ke tiu peza, kuprokirasita korpo pretiĝas al subita atako, kiu povas decidi pri la batalo. La retisto dume jen alsaltadis al li, jen forsaltadis, farante per sia tridenta forkego movojn tiel rapidajn, ke la homa rigardo apenaŭ povis ilin sekvi. La tinto de la dentoj kon-

<sup>307</sup> Non te peto, piscem peto,  
quid me fugis, Galle.

traŭ la kiraso aŭdiĝis kelkfoje, sed la gaŭlo eĉ ne ŝanceliĝis, donante per tio ateston pri sia grandega forto. Lia tuta atento ŝajnis esti koncentrita ne sur la tridento, sed sur la reto, kiu senĉese ŝvebis super lia kapo, kiel malbonaŭgura birdo. La spektantoj, retenante la spiron en la brusto, observis la majstran ludon de la gladiatoroj. Buĉulo, trovinte konvenan momenton, falegis fine sur sian kontraŭulon, kaj tiu kun sama rapideco trakuris sub lia glavo kaj levita brako, rektiĝis kaj eksvingis la reton.

La gaŭlo, turniĝinte loke, haltigis ĝin per sia ŝildo, post kio ambaŭ dissaltis. En la amfiteatro ektondris la ek-krioj: «*Macte!*», kaj en la malpli altaj vicoj oni komencis fari novajn vetojn. Nerono mem, kiu komence interparolis kun la vestalo Rubria kaj nemulte atentis ĝis nun la spektaklon, turnis la kapon al la areno.

Kaj ili komencis batali tiel majstre, kun tia precizeco de movoj, ke ŝajnis momente, kvazaŭ ili batalas ne pro vivo aŭ morto, sed por elmontri sian lertecon. Buĉulo, ankoraŭ dufoje evitinte la reton, komencis repaŝi al la rando de la areno. Tiam tamen tiuj, kiuj vetis kontraŭ li, ne volante, ke li ripozu, komencis krei: «*Ataku!*» La gaŭlo obeis kaj atakis. La brako de la retisto eksangis kaj lia reto malleviĝis. Buĉulo kuntiriĝis kaj eksaltis, volante bati la lastan baton. Sed en la sama momento Kalendio, kiu intence

ŝajnis, ke li ne povas manovri plu la reton, kliniĝis flanken, evitis la baton kaj, enŝovinte la tridenton inter la genuojn de la kontraŭulo, faligis lin teren.

Tiu volis leviĝi, sed en momento ĉirkaŭvolvis lin la fatalaj ŝnuroj, en kiuj ĉe ĉiu movo li pli implikis la manojn kaj la piedojn. Dume la batoj de la tridento fiksadis lin fojon post fojo al la tero. Foje ankoraŭ li kolektis la fortojn, apogis sin sur la mano kaj streĉis sin por leviĝi — vane! Li levis ankoraŭ al la kapo la malfortiĝantan manon, en kiu li ne povis plu teni la glavon, kaj falis dorsen. Kalendio premis lian kolon al la tero per la dentoj de la forkego kaj, apoginte sin ambaŭmane sur ĝia tenilo, turniĝis al la imperiestra loĝio.

La tuta cirko ekstremis de aplaŭdoj kaj de homa muĝado. Por la partianoj de Kalendio li estis ĉi-momente pli granda ol la imperiestro, sed ĝuste tial malaperis el iliaj koroj la malamikeco kontraŭ Buĉulo, kiu per la prezo de sia sango plenigis iliajn poŝojn. Dividiĝis do la deziroj de la popolo. Sur ĉiuj benkoj montriĝis samnombre la signoj de morto kaj la signoj de kompatato, sed la retisto rigardis nur al la loĝio de la imperiestro kaj vestaloj, atendente, kion ili decidis.

Malfeliĉe, Nerono ne havis simpatian al Buĉulo, ĉar dum lasta cirkoludo antaŭ la brulego li malgajnis, vetante

kontraŭ li, grandan monsumon al Licinio, li elŝovis do la manon el la podio kaj turnis la dikfingron al la tero.

La vestaloj tuj ripetis la signon. Tiam Kalendio genuiĝis sur la brusto de la gaŭlo, eligis mallongan ponardon, kiun li portis ĉe la zono, kaj flankiginte la armaĵon ĉe la kolo de la kontraŭulo, enbatis ĝis la tenilo en lian gorĝon la triangulan akraĵon.

— *Peractum est!* — aŭdiĝis voĉoj en la amfiteatro.

Buĉulo konvulsiis dum iom da tempo, kiel buĉita bovo, kaj batis la sablon per la piedoj, poste li streĉiĝis kaj restis senmova.

Merkuro ne bezonis kontroli per ardanta feraĵo, ĉu li vivas ankoraŭ. Tuj oni forigis lin kaj ekluktis aliaj paroj, post kies paso ekflamis nur la batalo de la tutaj taĉmentoj. La popolo partoprenis ĝin per la animo, koro kaj okuloj: ĝi kriegis, muĝis, fajfis, aplaŭdis, ridis, stimulus la batalantojn, frenezis. Sur la areno la gladiatoroj, dividitaj en du partiojn, batalis kun la furiozo de sovaĝaj bestoj: brusto frapis bruston, korpoj kuntordis sin en morta ĉirkaŭbrako, krakis en la artikoj potencaj kruroj, glavoj dronis en brustoj kaj ventroj, palaj buŝoj ŝprucigadis sangon sur la sablon. Kelkdek novulojn ekregis en la fino tia teruro, ke elŝirinte sin el la ĥaoso, ili komencis forkuri, sed la *mastigoforoj* repelis ilin en la batalon per siaj plumbofinitaj vip-

oj. Sur la sablo formiĝis grandaj, malhelaj makuloj; ĉiam pli da nudaj kaj armitaj korpoj kuŝis unu apud alia sur la sablo, kiel garboj. Vivantoj batalis sur la kadavroj, falpuŝiĝadis pro armaĵoj, ŝildoj, vundis la piedojn per rompitaĵarmiloj kaj faladis. La popolo frenezis pro ĝojo, ebriiĝadis per morto, spiris ĝin, satigadis per ĝia bildo la okulojn kaj kun volupto sorbis en la pulmojn ĝiajn odorojn.

La venkitoj kuŝis preskaŭ ĉiuj malvivaj. Apenaŭ kelkaj vunditoj genuiĝis en la mezo de la areno kaj, ŝanceliĝante, etendis la manojn al la spektantoj, petante kompaton. Al la venkintoj oni disdonis premiojn, laŭrokronojn, olivarbajn branĉetojn, kaj sekvis momento de ripozo, kiu laŭ la ordono de la ĉiopova imperiestro sin ŝanĝis en festenon. En la incensiloj oni ekbruligis aromaĵojn. Ŝprucigistoj pluvigis sur la popolon roson safranajn kaj violajn. Oni disportadis malvarmajn trinkaĵojn, rostitajn viandojn, dolĉajn kukaĵojn, vinon, olivoleon kaj fruktojn. La popolo manĝegis, interbabilis kaj kriis honore al la imperiestro por lin inklinigi al tiom pli granda malavareco. Efektive, kiam oni satigis la malsaton kaj soifon, centoj da sklavoj enportis korbojn, plenajn je donacoj; knabetoj, alivestitaj kiel amoroj, elprenadis el ili diversajn objektojn kaj disĵetadis ambaŭmane inter la benkojn. En la momento, kiam estis disdonataj loteriaj *teseroj*, komenciĝis batalo: la hom-

oj interpuŝis sin, renversadis, piedpremĉis unu aliajn, vokis helpon, saltis trans benkovicojn kaj sufokiĝadis en la terura interpremo, ĉar kiu ricevis feliĉan numeron, povis gajni eĉ domon kun ĝardeno, sklavon, luksan vestaĵon aŭ maloftan sovaĝan beston, kiun li poste vendus en amfiteatron. Pro tiuj kaŭzoj iĝadis tiaj ĥaosoj, ke multfoje pretorianoj devis enkonduki ordon, kaj post ĉiu disdonado oni elportadis el la rigardejo homojn kun rompitaĵbrakoj, kruroj, aŭ mortsufokitajn en la interpremo.

La pli riĉaj el la spektantoj tamen ne partoprenis en la batalo por la *teseroj*. La aŭgustanoj ĉi-foje sin amuzis per la vido de Ĥilono kaj per mokado je vanaj penoj, kiujn li faris por montri al la homoj, ke batalon kaj sangoverŝadon li povas rigardi egale kiel ĉiu alia. Vane tamen la malfeliĉa greko kuntiradis la brovojn, mordis la lipojn kaj premis la pugnojn tiel, ke la ungoj eniĝadis en la manojn. Same lia greka naturo, kiel lia persona timemo ne elportis tiajn spektaklojn. Lia vizaĝo paliĝis, gutoj da ŝvito perlukovris la frunton, la lipoj bluiĝis, enprofundiĝis la okuloj, la dentoj komencis klaki kaj la korpon atakis tremado. Post la batalo li iom rekonsciiĝis, kaj kiam oni lin mokpikis, ekregis lin subita kolero kaj malespere li komencis respondi la pikojn.

— Ha, greko! Malplaĉegas al ci la vido de disŝirita ho-

ma haŭto! — diris Vatinio, tirante lin je la barbo.

Ĥilono turnis al li siajn du lastajn flavajn dentojn kaj respondis:

— Mia patro ne estis botisto, do mi ne scias ĝin fliki.

— *Macte! Habet!* — ekkriis kelkaj voĉoj.

Sed aliaj mokis plu:

— Ne li estas kulpa, ke anstataŭ koro li havas en la busto pecon da fromaĝo! — ekkriis Seneciono.

— Ne ci estas kulpa, ke anstataŭ kapo ci havas vezikon, — respondis Ĥilono.

— Eble ci iĝos gladiatoro! Ci bone aspektus kun reto sur areno.

— Se cin mi kaptus per ĝi, mi kaptus malbonodoran upupon.

— Kaj kio estos pri la kristanoj? — demandis Festo el Ligurio. — Ĉu ci ne volus iĝi hundo kaj mordi ilin?

— Mi ne volus esti cia frato.

— Ci meocia<sup>308</sup> leprulo!

— Ci liguria mulo!

— Cia haŭto videble jukas, sed mi ne konsilas peti min, ke mi cin gratu.

— Gratu cin mem. Se ci forgratos ciajn pustulojn, ci detruos tion, kio estas en ci plej bona.

<sup>308</sup> Meocio, lat. *Palus Mæotis*, *Mæotius* — la marĉbaroj de la delto de Dono kaj la Azova maro, kiuj antikve estis opiniataj malsaniga loko.

Tiel ili atakadis lin, kaj li repikadis ilin malice meze de ĝenerala rido. Nerono aplaudis per la manoj, ripetadis: «*Macte!*» kaj stimulis ilin. Post momento tamen proksimiĝis Petronio kaj, tuŝinte per skulptita ebura bastono la ŝultron de la greko, diris:

— Bone, filozofa, sed en unu afero ci eraris: la dioj kreis cin kanajlo, ci tamen iĝis demono, kaj tial ci ne eltenos.

La maljunulo rigardis lin per siaj inflamruĝaj okuloj, ĉi-foje li tamen iel ne trovis pretan insulton. Por momento li eksilentis, poste respondis kvazaŭ kun certa peno:

— Mi eltenos!...

Sed dume la trumpetoj anoncis, ke la paŭzo estas finita. La homoj komencis forlasi la fakojn, en kiuj ili arĝis por rektigi la piedojn kaj babili. Komenciĝis ĝenerala movado kaj la kutimaj malpacoj pri la antaŭe okupitaj sidejoj. La senatanoj kaj patricioj rapidis al siaj lokoj. Iom post iom trankviliĝis la bruo kaj ordo revenis en la amfiteatron. Sur la areno aperis aro da homoj, por disrasti ankoraŭ tie kaj ie sablobulojn, kungluitajn per koagulinta sango.

Venis la vico por la kristanoj. Sed ĉar tio estis por la popolo spektaklo nova kaj neniu sciis, kiel ili kondutos, ĉiuj atendis ilin kun certa intereso. La amaso estis agord-



ita atendege, ĉar oni antaŭvidis eksterordinarajn scenojn, sed malamike. Tiuj homoj, kiuj estis nun aperontaj, bruligis ja Romon kaj ĝiajn antikvajn trezorojn. Ili ja nutris sin per la sango de suĉinfanoj, venenadis akvojn, malbenadis la tutan homan genton kaj plenumadis plej malnob-lajn krimojn. La ekscititan malamon ne kontentigus plej severaj punoj, kaj se ia timo kaptis la korojn, ĝi estis nur la timo, ĉu la turmentoj egalos la krimojn de tiuj malhumanaj kondamnitoj.

Dume la suno leviĝis alten kaj ĝiaj radioj, filtritaj tra la purpura velario, plenigis la amfiteatron per sanga lumo. La sablo alprenis fajran koloron kaj en tiuj briloj, en la homaj vizaĝoj, same kiel en la malplena spaco de la areno, pleniĝonta post momento per homa sufero kaj besta furiozo, estis io timiga. Ŝajnis, ke en la aero ŝvebas teruro kaj morto. La amaso, ordinare gaja, sub la influo de la malamo, obstinis en silento. La vizaĝoj havis malamikan esprimon.

Subite la prefekto donis la signon: tiam aperis la sama maljunulo, alivestita kiel Ĥarono, kiu antaŭe vokis al morto la gladiatorojn, kaj traირinte per malrapidaj paŝoj la tutan arenon, en profunda silento li denove frapis trifoje la pordegon per la martelo.

En la tuta amfiteatro aŭdiĝis la murmuro:

— La kristanoj! La kristanoj!

Ekgrincis la feraj kradoj: en la mallumaj malfermaĵoj eksonis la ordinaraj krioj de la *mastigoforoj*: «Sur la sablon!» kaj en unu momento la areno pleniĝis per aroj da kvazaŭ silvanoj, ĉirkaŭkudritaj per feloj. Ili ĉiuj kuris iom rapide, febre, kaj alkurinte la mezon de la sablorondo, genuiĝis unu apud la aliaj, kun manoj etenditaj supren. La popolo kredis, ke tio estas peto pri kompato, kaj furioza pro tia malkuraĝo, ĝi komencis piedfrapi, fajfi, ĵeti malplenajn ujojn de vino, ĉirkaŭmorditajn ostojn kaj muĝi: «Bestojn! Bestojn!...» Sed subite okazis io neatendita. Jen el la mezo de la vila amaso eksonis kantantaj voĉoj kaj en la sama momento aŭdiĝis kanto, kiun oni aŭdis unuafoje en roma cirko:

Christus regnat!!...<sup>309</sup>

Tiam mirego ekregis la popolon. La kondamnitoj kantis kun okuloj levitaj al la velario. Oni vidis vizaĝojn palajn, sed kvazaŭ inspiritajn. Ĉiuj komprenis, ke tiuj homoj ne petas kompaton kaj ke ili ŝajnas vidi nek la cirkon, nek la popolon, nek la senaton, nek la imperiestron. *Christus regnat!* sonis ĉiam pli laŭte, kaj sur la benkoj, for, ĝis la supro, inter la vicoj de la spektantoj tiu kaj iu demandis sin mem: kio okazas ĉi tie kaj kiu estas tiu *Christus*, kiu

<sup>309</sup> Kristo reĝas!

regas en la buŝoj de tiuj mortontoj?

Sed dume oni malfermis alian kradon kaj sur la arenon enkuris kun sovaĝa impeto kaj bojado tutaj aroj da hundoj: flavharaj grandegaj molosoj el Peloponezo, striaj hundoj el Pireneoj kaj lupsimilaj hundegoj el Hibernio, intence malsatigitaj, kun kaviĝintaj flankoj kaj sangaj okuloj. Muĝado kaj hurlado plenigis la tutan amfiteatron. La kristanoj, fininte la kanton, genuis senmove, kvazaŭ ŝtoniĝintaj, ripetante nur per unu ĝema ĥoro: «Pro Kristo! Pro Kristo!» La hundoj, flarinte homojn en la bestaj feloj kaj mirigitaj per ilia senmoveco, ne kuraĝis tuj ĵeti sin sur ilin. Kelkaj levadis sin sur la murojn de la loĝioj, kvazaŭ ili volus atingi la spektantojn, aliaj kuris ronde, ekscite bojante, kvazaŭ ili persekutus iun nevideblan beston. La popolo koleriĝis. Ekkriegis miloj da voĉoj: kelkaj el la spektantoj imitis la muĝadon de bestoj, aliaj bojis, kiel hundoj, aliaj instigis ilin en ĉiuj lingvoj. La amfiteatro ek-tremis de la kriegoj. La incititaj hundoj komencis jen ĵeti sin al la genuantoj, jen resalti ankoraŭ, ĝis fine unu el la molosoj enigis la dentegojn en la ŝultron de virino genuanta fronte kaj subtiris ŝin al si.

Tiam dekoj da ili ĵetis sin en la mezon, kvazaŭ tra elrompaĵo. La amaso ĉesis muĝi por rigardi kun pli granda atento. Meze de hurlado kaj raŭkado oni aŭdis ankoraŭ

plendajn voĉojn virajn kaj virinajn: «Pro Kristo! Pro Kristo!», sed sur la areno formiĝis tremantaj plektaĵoj el hundaj kaj homaj korpoj. Sango fluis nun torente el la disŝiritaj korpoj. La hundoj elŝiradis al si reciproke sangajn homajn membrojn. La odoro de sango kaj de disŝiritaj internaĵoj sufokis la arabajn aromojn kaj plenigis la tutan cirkon. Fine restis nur tie kaj ie hurlantaj amasoj.

Vinicio, kiu en la momento, kiam la kristanoj enkuris, leviĝis kaj turniĝis, por konforme al sia promeso montri al la fosisto la lokon, kie inter la sklavoj de Petronio estis la alivestita apostolo, sidiĝis denove kaj sidis kun vizaĝo de mortinto, rigardante per vitrosimilaj okuloj la teruran spektaklon. Komence la timo, ke la fosisto povis erari kaj ke Ligia povas trovi sin inter la viktimoj, tute paralizis lin, sed kiam li ekaŭdis la voĉojn: «Pro Kristo!» kiam li vidis la pereon de tiom da viktimoj, kiuj, mortante, atestis pri sia vero kaj pri sia Dio, ekposedis lin alia sento, turmenta, kiel plej terura doloro, tamen neforpuŝebla, ke se Kristo mem mortis martire, se nun miloj pro li pereas, se fluas maro da sango, tiam unu guto pli nenion signifas kaj ke peke estas eĉ peti kompaton. Tiu penso iris al li el la areno, traigadis lin kun la ĝemoj de la mortantoj, kun la odoro de ilia sango. Tamen li preĝis kaj ripetadis per sekaj lipoj: «Kristo! Kristo! Ankaŭ cia apostolo preĝas por ŝi!»

Poste li dronis en preĝon, ne plu konsciante, kie li estas; ŝajnis al li nur, ke la sango sur la areno ŝvelas kaj ŝvelas, ke ĝi multiĝas kaj elfluas el la cirko en la tutan Romon. Cetere li aŭdis nenion, nek la hurladon de la hundoj, nek la kriegojn de la popolo, nek la voĉojn de la aŭgustanoj, kiuj komencis subite voki:

— Ĥilono svenis!

— Ĥilono svenis! — ripetis Petronio, turnante sin al la greko.

Kaj tiu svenis efektive kaj sidis blanka, kiel tolo, kun malantaŭen klinita kapo kaj kun larĝe malfermita buŝo, simila al kadavro.

En la sama momento oni komencis puŝi sur la arenon novajn viktimojn, ĉirkaŭkudritajn per feloj.

Ili genuiĝadis senprokraste, kiel iliaj antaŭintoj, sed la lacegaj hundoj ne volis ilin mordi. Apenaŭ kelkaj ĵetis sin sur la plej proksimajn genuantojn, dum la aliaj, kuŝiĝinte kaj levinte supren la faŭkojn, de kiuj gutis sango, komencis movegi la flankojn kaj peze spiri.

Tiam la popolo, maltrankvila en la animo, sed ebria de sango, komencis voki per akraj voĉoj:

— La leonojn! La leonojn! Ellasu la leonojn!

La leonoj devis esti lasitaj por la sekvonta tago, sed en la amfiteatroj la popolo trudis sian volon al ĉiuj, eĉ al la

imperiestro. La sola Kaligulo, maltima kaj ŝanĝema en siaj ekdeziroj, kuraĝis iafoje kontraŭstari, kaj okazadis eĉ, ke li ordonis bastoni la amasojn, sed ankaŭ li plej ofte cedadis. Nerono, al kiu aplaŭdoj estis pli karaj ol ĉio en la mondo, neniam kontraŭstaris, tiom pli do li ne kontraŭstaris nun, kiam la afero koncernis mildigon de la amasoj, ekscititaj post la brulego, kaj la kristanojn, kiujn li volis ŝarĝi per la respondeco por la malfeliĉo.

Li donis do la signon, ke oni malfermu la tunelon, kion ekvidinte, la popolo tuj trankviliĝis. Oni ekaŭdis knaradon de la kradoj, post kiuj estis la leonoj. La hundoj je ilia vido densiĝis en unu aron kontraŭflanke de la areno, kaj ili komencis elpaŝi unu post alia sur la arenon, potencaj, flavharaj, kun grandegaj vilaj kapoj. Nerono mem turnis al ili sian enuigitan vizaĝon kaj almetis la smeraldon al la okulo por rigardi pli bone. La aŭgustanoj salutis ilin per aplaŭdoj; la amaso kalkulis ilin per la fingroj, observante ĉe tio avide, kiel ilia vido impresas la kristanojn genuantajn en la mezo, kiuj denove komencis ripeti la por multaj nekompreneblajn kaj ĉiujn incitantajn vortojn: «Pro Kristo! Pro Kristo!»

Sed la leonoj, kvankam malsategaj, ne rapidis al la viktimoj. La ruĝeta brilo sur la areno vundis iliajn okulojn, do ili palpebrumis, kvazaŭ blindigitaj; kelkaj streĉad-

is maldiligente siajn orflavajn, pezajn korpojn, aliaj malfermadis la faŭkojn, oscedis, kvazaŭ volante montri al la spektantoj siajn terurajn dentegojn. Sed poste laodoro de sango kaj de la disŝiritaj korpoj, kiuj kuŝis amase sur la areno, komencis efiki ilin.

Baldaŭ iliaj movoj iĝis maltrankvilaj, la kolharoj hirtigis, la nazoj raŭke sorbis la aeron. Unu alsaltis subite al la kadavro de virino kun mordŝirita vizaĝo kaj, metinte la antaŭajn piedegojn sur la korpon, komencis leki per sia malglata lango la sangajn koagulaĵojn; alia leono proksimiĝis al kristano, tenanta en la brakoj infanon, ĉirkaŭkudritan per cervida felo.

La infano skuis sin de krio kaj ploro, ĉirkaŭbrakante konvulsie la kolon de la patro, dum tiu ĉi, dezirante longigi ĝian vivon almenaŭ por momento, penis dekroĉi ĝin de la kolo kaj transdoni al tiuj, kiuj genuis malantaŭ li. Sed la krio kaj la movo incitis la leonon. Subite ĝi eligis mallongan, ŝiritan muĝon, dispremis la infanon per unu piedbato kaj kaptinte en la faŭkon la kranion de la patro, frakasis ĝin en unu momento.

Je tiu vido ĉiuj aliaj ĵetis sin sur la aron de la kristanoj. Kelkaj virinoj ne povis deteni ekkriojn de teruro, sed la popolo superbruis ilin per aplaŭdoj, kiuj tamen rapide silentiĝis, ĉar la scivolo venkis. Oni vidis tiam terurajn bild-

ojn: kapojn tute malaperantajn en la abismoj de la faŭkoj, brustojn larĝe distranĉatajn per unu bato de la dentegoj, elŝiritajn korojn kaj pulmojn; oni aŭdis la krakadon de ostoj inter la dentoj. Kelkaj leonoj, kaptinte siajn viktimojn je la flankoj aŭ sakroj, rondkuris en frenezaj saltoj tra la areno, kvazaŭ serĉante kaŝitan lokon, kie ili povus formanĝi ilin; aliaj en reciproka batalo levis sin unu sur alian, ĉirkaŭprenante sin reciproke per la piedegoj, kiel luktilistoj, kaj plenigante la amfiteatron per tondro. Homoj leviĝadis de siaj lokoj. Aliaj, forlasante la vicojn, iris tra la interbenkoj pli malsupren por vidi pli bone, kaj interpretis sin tie ĝis sufoko. Ŝajnis, ke la ekscititaj amasoj ĵetos sin fine sur la arenon mem kaj komencos disŝiri kun la leonoj. Iafoje oni aŭdis nehoman kriadon, iafoje aplaŭdojn, iafoje muĝadon, murmuradon, dentklakadon, hurladon de la molosoj, iafoje nur ĝemojn.

Nerono, tenante la smeraldon ĉe la okulo, rigardis nun atente. La vizaĝo de Petronio alprenis la esprimon de malplaĉo kaj malestimo. Ĥilonon oni jam antaŭe elportis el la cirko.

Kaj el la tuneloj oni elpuŝadis ĉiam novajn viktimojn.

De la plej alta vico de la amfiteatro rigardis ilin Petro la apostolo. Neniu lin observis, ĉar ĉiuj kapoj estis turnitaj al la areno, do li leviĝis kaj kiel iam en la vinberejo de



Kornelio li benis je la morto kaj eterneco la forkaptotojn, tiel nun li benis per la signo de kruco tiujn, kiuj estis pereantaj de la bestaj dentegoj, li benis ilian sangon kaj ilian doloron kaj la malvivajn korpojn, ŝanĝitajn en senformajn bulojn, kaj la animojn, flugantajn supren de la sanga sablo. Kelkaj levadis al li la okulojn kaj tiam lumiĝadis iliaj vizaĝoj kaj ili ridetis, vidante for, super si, la signon de kruco. Lia koro ŝiris sin kaj li parolis:

«Ho Sinjoro, fariĝu cia volo, ĉar je cia gloro, ateste al la vero, pereas tiuj miaj ŝafoj! Ci ordonis al mi ilin paŝti, do al ci mi ilin transdonas, kaj ci kalkulu ilin, Sinjoro, prenu ilin, cikatrigu iliajn vundojn, kvietigu ilian doloron kaj donu al ili pli da feliĉo ol kiom da turmentoj ili suferis ĉi tie.»

Kaj li krucosignis ilin, unu post alia, aron post aro, kun amo tiel granda, kvazaŭ ili estus liaj infanoj, kiujn li transdonas rekte en la manojn de Kristo.

Subite Nerono, ĉu pro sangebrieco, aŭ volante, ke la spektaklo superu ĉion, kion ĝis nun oni vidis en Romo, flustris kelkajn vortojn al la urboprefekto, kaj tiu, forlasinte la podion, direktis sin tuj al la tuneloj. Kaj eĉ la popolo jam ekmiris, kiam ĝi ekvidis post momento la kradojn denove malfermiĝi. Oni ellasis nun ĉiaspecajn bestojn: tigrojn el apud Eŭfrato, numidajn panterojn, ursojn, lupojn,

henojn kaj ŝakalojn. La tutan arenon kovris kvazaŭ moviĝanta ondo da feloj striitaj, flavaj, linkoloraj, malhelaj, brunaj kaj makulaj. Iĝis ĥaoso, en kiu la okuloj povis jam nenion distingi, krom terura renversiĝado kaj interplektado de bestaj dorsoj. La spektaklo ĉesis simili realaĵon kaj ŝanĝis sin kvazaŭ en orgion de sango, kvazaŭ en teruran sonĝon, kvazaŭ en monstran vizion de frenezulo. La mezuro tropleniĝis. Meze de muĝoj, hurloj kaj blekoj tie kaj ie sur la benkoj de la spektantoj aŭdiĝis akraj, spasmaj ridoj de virinoj, kies fortoj fine elĉerpiĝis.

La homojn kaptis teruro. La vizaĝoj ombrokovriĝis. Multaj voĉoj komencis krei: «Sufiĉe! Sufiĉe!»

Sed la bestojn pli facile estis enlasi ol elpeli. Nerono trovis tamen rimedon por purigi de ili la arenon, rimedon, ligitan kun nova distro por la popolo. En ĉiuj interbenkoj aperis taĉmentoj da nigraj numidoj, ornamitaj per plumoj kaj orelingoj, tenantaj pafarkojn en la manoj. La popolo divenis, kio sekvos, kaj akceptis ilin per ekkrio de kontenteco; la numidoj proksimiĝis al la rando kaj, metinte sagojn sur la tendenojn, komencis per la arkoj pafi la bestamason. Ĝi estis efektive nova spektaklo. La fleksemaĵoj, nigraj korpoj klinadis sin malantaŭen, streĉante la elastajn pafarkojn kaj sendante sagon post sago. La knarado de la tendenoj kaj la fajfado de la plumfinitaj pafaĵoj miksis sin

kun hurlado de la bestoj kaj mirkrioj de la spektantoj. Lu-  
poj, ursoj, panteroj kaj homoj, kiuj restis ankoraŭ vivaj,  
faladis amase unu apud aliaj. Tie kaj ie leono, eksentinte  
sagon en la flanko, per rapida movo turnis la faŭkon tord-  
itan pro furiozo por kapti kaj frakasi la tenilon. Aliaj ĝe-  
mis pro doloro. La malgrandaj bestoj, frapitaj de teruro,  
blinde kuris tra la areno aŭ batis la kradojn per la kapoj,  
kaj dume la sagoj fajfis kaj fajfis senĉese, ĝis ĉio, kio vivis,  
kuŝis en la tremoj de agonio.

Tiam la arenon enkuris centoj da cirkaj sklavoj, armit-  
aj per fosiloj, ŝoveliloj, balailoj, puŝĉaroj, korboj por el-  
porti la internaĵojn kaj sakoj kun sablo. Unuj fluis post  
aliaj kaj sur la tuta areno eksvarmis febra agado. Tuj oni  
purigis ĝin de la kadavroj, de sango kaj ekskremento, tra-  
rastis, ebenigis kaj surŝutis per dika tavolo da freŝa sablo.  
Poste enkuris amoretoj, disŝutante petalojn de rozoj, lilioj  
kaj plej diversaj floroj. Oni ekbruligis denove incensojn  
kaj forigis la velarion, ĉar la suno jam estis sufiĉe malalt-  
iĝinta.

Kaj en la amaso la homoj rigardis sin reciproke kun  
miro, demandante unu alian, kia plua spektaklo atendas  
ilin ankoraŭ en tiu ĉi tago.

Efektive atendis ilin spektaklo, kiun neniu antaŭvidis.  
La imperiestro, kiu antaŭ kelka tempo estis forlasinta la

podion, nun aperis subite sur la florkovrita areno, vestite per purpura togo kaj ora laŭrokrono. Dek du kantistoj kun citroj en la manoj lin sekvis; tenante arĝentan liuton, Nerono solene elpaŝis en la mezon kaj, riverencinte kelkfoje al la spektantoj, levis la okulojn al la ĉielo kaj staris tiel ian tempon, kvazaŭ atendente inspiron.

Poste li ekbatis la kordojn kaj komencis kanti:

*Ho luma filo de Latono,  
Estr' de Tenedo, Killo, Ĥrizo,<sup>310</sup>  
Kial la sanktan Ilionon,  
Al cia gard' sin konfidintan,  
Al aĥajana venĝ' ci donis,  
Kaj lasis la altarojn sanktajn.  
Senrompe glor' al ci flamantajn,  
Makuli per trojana sango?  
Treme cin vokis maljunuloj,  
Forenpafanto Arĝentarka,  
Plore petegis cin patrinoj,  
Vokante el la fund' de l' koro,  
Ke ŝparu ci iliajn idojn;  
Eĉ ŝtonon tuŝus tiuj veoj,  
Sed ci, Sminte',<sup>311</sup> al kordoloro,  
Estis ol ŝtono malpli mola!...*

<sup>310</sup> Perifrazaj nomoj de Apolono, uzataj de Homero. **Latono**: titanidino, patrino de Apolono kaj Diano. **Tenedo** [PIV] Insulo en la Egea maro, kontraŭ Trojo. **Killo** (gr. Κίλλα): alia insulo aŭ urbo proksima al Trojo. **Ĥrizo** (gr. Χρύση): mita insulo dediĉita al Apolono.

<sup>311</sup> **Sminteo** (gr. Σμινθεύς, «reganto de la musoj») — alnomo de Apolono. Homero mencias templon de Apolono Sminteo apud Ĥrizo.

La kanto iom post iom ŝanĝiĝadis en plendan, dolorplenan elegion. En la cirko ekregis silento. Post momento Nerono, mem kortuŝita, komencis kanti plu:

*Ci povis per liuta sono  
Dispeli for la koralamenton,  
Dum la okulon eĉ hodiaŭ  
Larm' kovras, kiel floron roso,  
Pro tiu kanto malserena,  
Kiu el cindroj renaskiĝas.  
La brulotagon de l' pereco ...  
— Kaj ci permesis ĝin, Sminteo?!*

Ĉe tio lia voĉo ekstremis kaj malsekiĝis la pupiloj. Sur la okulharoj de la vestaloj aperis larmoj, la popolo aŭskultis silente, antaŭ ol ĝi eksplodis per longe daŭranta uragano da aplaŭdoj.

Dume el ekstere, tra la vomitorioj, malfermitaj por aerumi la cirkon, aŭdiĝadis knarado de veturiloj, sur kiujn oni metis la sangajn restaĵojn de la kristanoj, viroj, virinoj kaj infanoj, por ilin porti al la teruraj kavoj, nomataj *puticuli*.

Kaj Petro la apostolo ĉirkaŭprenis per la manoj sian blankan kapon kaj vokis interne:

«Sinjoro! Sinjoro! Al kiu ci donis la regadon de la mondo? Kaj kial ci volas fondi cian metropolon en tiu ĉi urbo?»

## Ĉapitro 57<sup>a</sup>

Dume la suno malleviĝis okcidenten kaj ŝajnis solvi sin en la vespera ĉielruĝo. La spektaklo estis finita. La amasoj komencis forlasi la amfiteatron kaj fluegi en la urbon tra la elirejoj, nomataj *vomitorioj*. Nur la aŭgustanoj malrapidis, atendente, ke la ondo trafluu. Tuta ilia aro, forlasinte siajn lokojn, grupiĝis apud la podio, en kiu Nerono aperis denove por aŭskulti laŭdojn. Kvankam la spektantoj ne avaris al li aplaŭdojn tuj post la fino de la kanto, por li tio ne estis sufiĉa, ĉar li atendis entuziasmon, proksiman al frenezo. Vane sonis nun laŭdaj himnoj, vane la vestaloj kisis liajn «diajn» manojn, kaj Rubria kliniĝis ĉe tio tiel, ke ŝia ruĝbruna hararo tuŝis lian bruston. Nerono ne estis kontenta kaj li ne sciis tion kaŝi. Mirigis lin kaj kune maltrankviligis ankaŭ tio, ke Petronio restas silenta. Vorto el lia buŝo, laŭda kaj kune trafe gloranta la valorojn de la kanto, estus ĉi-momente granda konsolo por Nerono. Fine, ne povante elteni plu, li signis al Petronio, kaj kiam tiu ĉi eniris la podion, li diris:

— Ekparolu...

Kaj Petronio respondis malvarme:

— Mi silentas, ĉar mi ne povas trovi vortojn. Ci superis cin mem.

– Tiel ankaŭ al mi ŝajnis, tamen tiu popolo?...

– Ĉu ci povas postuli ke tiuj mikstrasuloj komprenu poezion?

– Do ankaŭ ci rimarkis, ke oni ne dankis min laŭme-rite?

– Ĉar ci elektis malbonan momenton.

– Kial?

– Tial, ke la cerboj, ebriaj de la sangodoro, ne povas aŭskulti atente.

Nerono kunpremis la pugnojn kaj respondis:

– Ha, tiuj kristanoj! Ili bruligis Romon, kaj nun ili ankaŭ min suferigas. Kiajn punojn pli mi elpensu por ili?

Petronio rimarkis, ke li iras malbonan vojon kaj ke la efiko de liaj vortoj estas kontraŭa al tiu, kiun li intencis atingi, tial, volante turni la atenton de Nerono en alian direkton, li kliniĝis al li kaj flustris:

– Cia kanto estas mirinda, sed mi faros al ci nur unu rimarkon: en la kvara verso de la tria strofo la metriko lasas ion por deziri.

Nerono ekflamis de honto, kvazaŭ kaptita ĉe malglora faro, rigardis timigite kaj respondis same mallaŭte:

– Ci ĉion rimarkas!... Mi scias!... mi ĝin bonigos! Sed neniu pli tion rimarkis? Vere? Kaj ci, je la dioj, diru al neniu ... se ... cia vivo estas al ci kara...

Je tio Petronio kuntiris la brovojn kaj respondis kva-zaŭ kun eksplodo de enuo kaj laceco:

— Ci povas, dia, kondamni min al morto, se mi cin ĝenas, sed ne teruru min per morto, ĉar la dioj plej bone scias, ĉu mi ĝin timas.

Dirinte ĉi tion, li komencis rigardi rekte en la okulojn de Nerono, kaj tiu post momento respondis:

— Ne koleru... Ci scias, ke mi cin amas...

«Malbona signo!» — ekpensis Petronio.

— Mi intencis inviti vin hodiaŭ al festeno, — parolis Nerono, — sed mi preferas resti sola kaj poluri tiun malbenitan verson de la tria strofo. Krom ci la eraron povis rimarki ankoraŭ Seneko, kaj eble ankaŭ Sekundo Karinato, sed tuj mi liberiĝos de ili.

Dirinte ĉi tion, li vokis Senekon kaj anoncis al li, ke li sendas lin kun Akrato kaj Sekundo Karinato<sup>312</sup> en Italujon kaj en ĉiujn provincojn, ordonante al ili havigi monon el urboj, el vilaĝoj, el famaj temploj, unuvorte el ĉie, kie oni nur povis ĝin trovi aŭ eligi. Sed Seneko, kiu komprenis, ke oni komisiis al li la rolon de premisto, sakrilegiulo kaj rabisto, rekte rifuzis.

— Mi devas iri kamparon, sinjoro, — li diris, — kaj tie

<sup>312</sup> La ekssklavo Akrato (lat. *Acratus* de gr. Ἄκρατος) kaj Sekundo Karinato (*Secundus Carrinas*, gen. *Carrinatis*), pri kies misio Tacito, tre malaprobe, rakontas en siaj *Analoj* (15:45, 16:23).



atendi la morton, ĉar mi estas maljuna kaj miaj nervoj bezonas ripozon.

La iberiaj nervoj de Seneko, pli fortaj ol tiuj de Hîlono, ne estis eble malsanaj, ĝenerale li tamen fartis malbone, ĉar li aspektis kiel ombro, kaj lia kapo en la lasta tempo iĝis tute blanka.

Nerono do, rigardante lin, ekpensis, ke eble efektive li nelonge atendos lian morton, kaj respondis:

— Mi ne volas lacigi cin per vojaĝo, se ci estas malsana, sed ĉar pro la amo, kiun mi sentas al ci, mi deziras havi cin proksime, tial, anstataŭ iri kamparon, ci fermos cin en cia domo kaj ne forlasados ĝin.

Poste li ekridis kaj diris:

— Se mi sendos Akraton kaj Karinaton solaj, tio estos kvazaŭ mi sendus lupojn por alporti ŝafojn. Kiun mi estrigu super ili?

— Estrigu min, sinjoro, — diris Domicio Afro.

— Ne! Mi ne volas elmeti Romon al la kolero de Merkuro, kiun vi hontigus per via ŝtelarto. Mi bezonas stoikiston, kiel Seneko, aŭ kiel mia nova amiko-filozofo, Hîlono.

Dirinte ĉi tion, li komencis rigardi ĉirkaŭen kaj demandis:

— Kio okazis al Hîlono?

Kaj Ĥilono, kiu, rekonsciiĝinte en la freŝa aero, revenis la amfiteatron por ĉeesti la kanton de la imperiestro, alproksimiĝis kaj diris:

— Jen mi estas, ho radia ido de l' suno kaj de la luno. Mi estis malsana, sed cia kanto resanigis min.

— Mi sendos cin en Aĥajon, — diris Nerono. — Ci certe scias pri ĉiu monero, kiu estos tie en ĉiu templo.

— Faru ĝin, Zeŭso, kaj la dioj havigos al ci tian tributon, kian neniam ili al iu havigis.

— Mi ĝin farus, sed mi ne volas cin senigi de la vido de la cirkoludoj.

— Ho Baalo! — diris Ĥilono.

Sed la aŭgustanoj, kontentaj ke la humoro de Nerono pliboniĝis, komencis ridi kaj moki:

— Ne, sinjoro! Ne senigu ĉi tiun bravan grekon ĉe la vido de la cirkoludoj!

— Sed senigu min, sinjoro, de la vido de ĉi tiuj kapitolaj anseridoj, kies cerboj, kune prenitaj, ne plenigus la pladeton de glano, — respondis Ĥilono. — Mi verkas, ho unuenaskita filo de Apolono, greke himnon je cia gloro, kaj tial mi volas pasigi kelkajn tagojn en la templo de Muzoj por peti ilin pri inspiro.

— Ho ne! — ekkriis Nerono. — Ci volas elturniĝi de la sekvontaj spektakloj. Vane!

— Mi ĵuras al ci, sinjoro, ke mi verkas himnon.

— Ci do verkados ĝin nokte. Petu la inspiron de Dia-  
no. Ŝi ja estas fratino de Apolono.

Hilono mallevis la kapon, rigardante kolere la ĉeest-  
antojn, kiuj denove komencis ridi. Nerono dume, sin tur-  
ninte al Seneciono kaj al Sviolio Neruleno, diris:

— Imagu, ke el la kristanoj destinitaj por hodiaŭ ni  
sukcesis fini apenaŭ kun duono.

Tiam la maljuna Akvilio Regulo, granda kompetent-  
ulo en la aferoj koncernantaj la amfiteatron, enpensiĝis  
momente kaj diris:

— Tiuj spektakloj, en kiuj partoprenas homoj *sine ar-  
mis et sine arte*,<sup>313</sup> daŭras preskaŭ same longe, sed malpli  
interesas.

— Mi ordonos doni al ili armilojn, — respondis Nero-  
no.

Sed la superstiĉa Vesteno vekiĝis subite el medito kaj  
demandis per mistera voĉo:

— Ĉu vi rimarkis, ke ili vidas ion, mortante? Ili rigard-  
as supren kaj mortas kvazaŭ sen sufero. Mi estas certa, ke  
ili ion vidas...

Dirinte ĉi tion, li levis la okulojn al la malfermaĵo de  
la amfiteatro, super kiu la nokto komencis jam etendi sian

<sup>313</sup> Sen armilo kaj sen arto (lat.).

stelbroditan velarion. La aliaj tamen respondis per rido kaj per ŝercaj supozoj, kion la kristanoj povas vidi en la momento de la morto. Dume Nerono donis signon al sklavoj, tenantaj torĉojn, kaj forlasis la cirkon; post li iris la vestaloj, la senatanoj, la oficistoj kaj la aŭgustanoj.

La nokto estis hela, varma. Antaŭ la cirko svarmis ankoraŭ amasoj, dezirantaj vidi la forveturon de la imperiestro, sed iel malserenaj kaj silentaj. Tie kaj ie aŭdiĝis aplaŭdo kaj ĉesis. El la kadavrejo knarantaj veturiloj forportadis senrompe la sangajn restaĵojn de la kristanoj.

Petronio kaj Vinicio iris sian vojon en silento. Nur proksime de la domo Petronio demandis:

— Ĉu ci pensis pri tio, kion mi diris al ci?

— Jes, — respondis Vinicio.

— Ĉu ci kredas, ke nun ankaŭ por mi ĝi estas ĉefgrava afero? Mi devas ŝin liberigi spite al la imperiestro kaj al Tigeleno. Ĝi estas kvazaŭ batalo, en kiu mi ekobstinis venki, ĝi estas kvazaŭ ludo, en kiu mi volas gajni, eĉ je la prezo de mia kapo ... La hodiaŭa tago plikonfirmis min ankoraŭ en tiu ĉi entrepreno.

— Kristo cin rekompencu.

— Ci vidos.

Tiel interparolante, ili ekstaris antaŭ la pordo de la domo kaj eliris el la portilo. En ĉi tiu momento iu malhela

figuro proksimiĝis al ili kaj demandis:

— Ĉu estas ĉi tie la nobla Vinicio?

— Jes, — respondis la tribunuso, — kion ci volas?

— Mi estas Nazario, la filo de Mirjam': mi venas el la malliberejo kaj alportas al ci novaĵon pri Ligia.

Vinicio apogis la manon sur lia ŝultro kaj ĉe la lumo de torĉo komencis rigardi en liajn okulojn, ne povante eldiri eĉ vorton, sed Nazario divenis la demandon, morthaltintan sur liaj lipoj, kaj diris:

— Ŝi vivas ĝis nun. Urso sendas min al ci, sinjoro, por diri al ci, ke en febro ŝi preĝas kaj ripetas cian nomon.

Kaj Vinicio respondis:

— Gloro estu al Kristo, kiu povas ŝin redoni al mi.

Poste, kunpreninte Nazaron, li kondukis lin en la bibliotekon. Post momento tamen venis ankaŭ Petronio por aŭdi ilian interparolon.

— La malsano savis ŝin de la malhonoro, ĉar la turmentistoj timas, — parolis la juna knabo. — Urso kaj Glaŭko la kuracisto gardas ŝin tage kaj nokte.

— Ĉu restis la samaj gardistoj?

— Jes, sinjoro, kaj ŝi estas en ilia ĉambreto. La malliberuloj, kiuj estis en la malsupra tenejo, ĉiuj mortis pro febro aŭ sufokiĝis en la malbonaero.

— Kiu ci estas? — demandis Petronio.

— La nobla Vinicio min konas. Mi estas filo de la vidvino, ĉe kiu Ligia loĝis.

— Kaj ci estas kristano?

La knabo demande rigardis Vinicion, sed vidante, ke tiu ĉi preĝas ĉi-momente, levis la kapon kaj diris:

— Jes.

— Kiamaniere ci povas libere eniradi la malliberejon?

— Mi dungigis por elportado de la mortintoj, sinjoro, kaj mi faris ĝin speciale por donadi helpon al miaj fratoj kaj alportadi al ili novaĵojn el la urbo.

Petronio komencis rigardi pli atente la belegan vizaĝon de la junulo, liajn bluajn okulojn kaj nigrajn, abundajn harojn, poste li demandis:

— El kiu lando ci estas, knabo?

— Mi estas galileano, sinjoro.

— Ĉu ci volus, ke Ligia estu libera?

La knabo levis la okulojn supren:

— Eĉ se mi mem devus poste morti.

Vinicio ĉesis subite preĝi kaj diris:

— Diru al la gardistoj, ke ili metu ŝin en ĉerkon, kiel mortintan. Ci mem trovu helpantojn, kiuj nokte elportos ŝin kune kun ci. Proksime de la Malbonodoraj Kavoj vi trovos homojn, atendantajn kun portilo, al kiuj vi transdonos la ĉerkon. Al la gardistoj promesu en mia nomo

tiom da oro, kiom ĉiu povos porti en la mantelo.

Kiam li tiel parolis, lia vizaĝo perdis la ordinaran sen-  
vivecon, vekiĝis en li soldato, al kiu la espero redonis la  
antaŭan energion.

Kaj Nazario ekflamis de ĝojo kaj levinte la manojn su-  
pren, ekkriis:

— Kristo ŝin sanigu, ĉar ŝi estos libera.

— Ĉu ci opinias, ke la gardistoj konsentos? — demand-  
is Petronio.

— Ili, sinjoro? Ili nur sciu, ke ne trafos ilin por tio pu-  
no kaj torturo!

— Jes! — diris Vinicio. — La gardistoj volis konsenti eĉ  
ŝian forkuron, tiom pli ili permesos elporti ŝin kiel mort-  
intan.

— Estas vere homo, — diris Nazario, — kiu kontrolas  
per ardanta feraĵo, ĉu la korpoj, kiujn ni elportas, estas  
mortintaj. Sed li prenas eĉ po kelkaj sestercoj por tio, ke li  
ne tuŝu per la feraĵo la vizaĝojn de la mortintoj. Por unu  
ormonero li tuŝos la ĉerkon, ne la korpon.

— Diru al li, ke li ricevos plenan sakon da ormoner-  
oj, — diris Petronio. — Sed ĉu ci povos trovi fidindajn  
helpantojn?

— Mi povas trovi tiajn, kiuj por mono forvendus siajn  
edzinojn kaj infanojn.

— Kie ci trovos ilin?

— En la malliberejo mem aŭ en la urbo. La gardistoj, foje subaĉetitaj, enkondukos, kiun mi volos.

— Sekve enkonduku min, kiel dungiton, — diris Vinicio.

Sed Petronio komencis firmege malkonsili al li tion. La pretorianoj povus rekoni lin eĉ alivestitan, kaj ĉio povus neniigi.

— Nek en la malliberejo, nek apud la Malbonodoraj Kavoj, — li diris. — Necesas, ke ĉiuj, ankaŭ Nerono kaj Tigeleno, estu konvinkitaj, ke Ligia mortis, ĉar alie ili senprokraste ordonus ŝin ĉasi. Ni povas forturni la suspektajn nur tiel, ke kiam ŝin oni forkondukos en la Albanan montaron aŭ pli malproksimen, en Sicilion, ni restos en Romo. Nur unu aŭ du semajnojn poste ankaŭ ci malsaniĝos kaj venigos la imperiestran kuraciston, kiu ordonos al ci iri en montaron. Tiam vi kuniĝos, kaj poste...

Ĉe tio li enpenisiĝis momente kaj, svinginte la manon, diris:

— Poste eble venos alia tempo.

— Kristo kompatu ŝin, — diris Vinicio, — ĉar ci parolas pri Sicilio, sed ŝi estas malsana kaj povas morti...

— Dume ni ŝin lokos pli proksime. Ni nur elŝiru ŝin el la malliberejo, kaj sanigos ŝin la sola aero. Ĉu ci ne havas



ie en la montaro iun farmiston, al kiu ci povus fidi?

— Jes! Mi havas. Jes! — respondis rapide Vinicio. — En la montaro apud Korioloj estas fidinda homo, kiu portadis min sur la brakoj, kiam mi estis ankoraŭ infano, kaj kiu ĝis nun min amas.

Petronio donis al li tabuletojn.

— Skribu al li, ke li venu ĉi tien morgaŭ. Kurieron mi sendos senprokraste.

Dirinte ĉi tion, li vokis la atriestron kaj donis al li konformajn ordonojn. Kelkajn minutojn poste sklavo ekrajdis antaŭ la nokto al Korioloj.

— Mi volus, — diris Vinicio, — ke Urso akompanu ŝin envoje ... Mi estus pli trankvila...

— Sinjoro, — diris Nazario, — li havas superhoman forton, li elrompos la kradon kaj sekvos ŝin. Estas tie unu fenestro en kruta, alta muro, apud kiu staras neniu gardo. Mi alportos al Urso ŝnuron, kaj la reston li faros mem.

— Je Herkulo! — diris Petronio, — li elrompiĝu, kiel al li plaĉas, sed ne kun ŝi kaj ne du aŭ tri tagojn post ŝi, ĉar oni sekvus lin kaj malkaŝus ŝian rifuĝejon. Je Herkulo! Ĉu vi volas pereigi vin mem kaj ŝin? Mi malpermesas al vi paroli al li pri Korioloj, aŭ mi lavas for la manojn.

Ili ambaŭ konfesis lian rimarkon prava kaj eksilentis. Poste Nazario komencis adiaŭi la du amikojn, promesante

veni la sekvontan matenon je la tagiĝo.

Kun la gardistoj li esperis interkonsenti ankoraŭ en la sama nokto, antaŭe li volis tamen viziti por momento sian patrinon, kiu en tiu necerta kaj terura tempo havis pro li eĉ ne unu trankvilan momenton. La helpanton li decidis post pripenso ne serĉi en la urbo, sed elekti kaj subaĉeti unu el tiuj, kiuj kune kun li elportadis la kadavrojn el la malliberejo.

Antaŭ la foriro mem li tamen haltis ankoraŭ kaj, preninte Vinicion flanken, komencis al li flustri:

— Sinjoro, mi diros pri nia plano al neniuj, eĉ ne al la patrino, sed Petro la apostolo promesis veni al ni el la amfiteatro kaj al li mi ĉion rakontos.

— Ci povas en ĉi tiu domo paroli laŭte, — respondis Vinicio. — Petro la apostolo estis en la amfiteatro kun la sklavoj de Petronio. Cetere mi mem iros kun ci.

Kaj li ordonis alporti al si sklavan mantelon, post kio ili eliris.

Petronio ekspiris profunde.

«Mi deziris», li pensis, «ke ŝi mortu pro tiu febro, ĉar por Vinicio tio estus malplej terura el ĉio. Sed nun mi estas preta oferi al Eskulapo oran tripiedon por ŝia saniĝo ... Ha, ci, Ahenobarbo, volas fari al ci spektaklon el la doloro de la amanto! Ci, aŭgustino, unue enviis la belecon de la

knabino, kaj nun ci disŝirus ŝin per ciaj dentoj tial, ke pereis cia Rufrio ... Ci, Tigeleno, volas ŝin pereigi spite al mi!... Ni vidos. Mi diras al vi, ke viaj okuloj ne vidos ŝin sur areno, ĉar aŭ ŝi mortos de natura morto, aŭ mi elŝiros ŝin el viaj manoj, kiel el hundaj faŭkoj ... Kaj mi elŝiros ŝin tiel, ke vi tion eĉ ne scios, kaj poste, kiomfoje mi vin rigardos, tiomfoje mi pensos: jen malsprituloj, kiujn mistifikis Petronio...»

Kaj kontenta pri si mem, li iris en la triklinion, kie kune kun Eŭniko li sidiĝis al vespermanĝo. Legisto legis al ili dum la manĝo idiliojn de Teokrito. Ekstere vento alpelis nubojn de Sorakto kaj subita fulmotondro konfuzis la trankvilon de la serena somera nokto. De tempo al tempo tondroj sonis sur la sep montetoj, kaj ili, kuŝante unu apud la alia ĉe la tablo, aŭskultis la idilian poeton, kiu en la melodia dialekto doria kantis la amon de paŝtistoj, kaj poste, trankviligitaj, ili pretigis sin al dolĉa ripozo.

Ankoraŭ antaŭe tamen revenis Vinicio. Petronio, eksciinte pri lia reveno, eliris al li kaj demandis:

— Kio do?... Ĉu vi interkonsilis ion novan? Kaj ĉu Nazario iris jam en la malliberejon?

— Jes, — respondis la juna viro, disŝovante la harojn, malsekajn de la pluvo. — Nazario iris interkonsenti kun la gardistoj, kaj mi vidis Petron, kiu ordonis al mi preĝi kaj

kredi.

— Bone. Se ĉio aranĝos sin favore, en la sekvonta nokto oni povos ŝin elporti...

— La farmisto kun la sklavoj devus veni antaŭ la tagiĝo.

— Tio estas mallonga vojo. Nun iru dormi.

Sed Vinicio genuiĝis en sia ĉambro kaj komencis preĝi.

Je la sunleviĝo alvenis de apud Korioloj la farmisto, Nigro, alkondukante kun si, konforme al la komisiono de Vinicio, mulojn, portilon kaj kvar fidindajn homojn, elektitajn el britaj sklavoj, kiujn cetere li lasis singarde en gastejo en Suburo.

Vinicio, kiu maldormis la tutan nokton, eliris renkonte al li, kaj tiu ĉi kortuŝiĝis ĉe la vido de sia juna sinjoro kaj, kisante liajn manojn kaj okulojn, diris:

— Mia kara, ĉu ci estas malsana, aŭ ĉagrenoj elsuĉis la sangon el cia vizaĝo, ĉar apenaŭ mi povis rekoni cin unuavide?

Vinicio kondukis lin en la internan galerion, nomatan *ksisto*,<sup>314</sup> kaj tie konfidis al li la sekreton. Nigro aŭskultis lin kun koncentrita atento kaj sur lia sana, sunbruna vizaĝo oni vidis grandan emocion, kiun li eĉ ne penis regi.

<sup>314</sup> Lat. *xystus* lat. ← gr. ξυστός — interna galerio en domo.

— Ŝi do estas kristanino? — li ekkriis.

Kaj li komencis explore rigardi la vizaĝon de Vinicio; tiu divenis videble, pri kio lin demandas la okuloj de la kamarano, ĉar li respondis:

— Ankaŭ mi estas kristano.

Tiam en la okuloj de Nigro ekbrilis larmoj; dum momento li silentis, poste, levinte la manojn supren, li diris:

— Ho, dankon al ci, Kristo, ke ci forigis la vualon de la okuloj plej karaj al mi en la mondo!

Poste li ĉirkaŭprenis la kapon de Vinicio kaj, plorante pro feliĉo, komencis kisi lian frunton.

Post momento alvenis Petronio, kondukante kun si Nazarion.

— Bonaj novaĵoj! — li diris de malproksime.

Efektive la novaĵoj estis bonaj. Unue Glaŭko la kuracisto garantiis pri la vivo de Ligia, kvankam ŝi suferis tiun saman febron, pro kiu same en Tulianumo, kiel en la aliaj malliberejoj mortadis ĉiutage centoj da homoj. Koncerne la gardistojn kaj la homon, kiu ekzamenis la morton per ardanta feraĵo, prezentiĝis nenia malfacilaĵo. Ankaŭ Atiso, la helpanto, jam estis subaĉetita.

— Ni faris malfermaĵojn en la ĉerko, por ke ŝi povu spiri, — diris Nazario. — La tuta danĝero konsistas en tio, ke ŝi ne ekĝemu aŭ ne ekparolu en la momento, kiam ni

estos pasantaj preter la pretorianoj. Sed ŝi estas tre malforta kaj de la mateno kuŝas kun fermitaj okuloj. Cetere Glaŭko donos al ŝi dormigilon, kiun li mem preparos el medikamentoj, alportitaj de mi el la urbo. La kovrilo de la ĉerko ne estos alnajlita. Vi levos ĝin facile, prenos Ligian en la portilon, kaj ni metos en la ĉerkon longforman sakon kun sablo, kiun havu preta.

Vinicio, aŭskultante tiujn ĉi vortojn, estis pala, kiel tolo, sed aŭskultis kun atento tiel streĉita, ke li ŝajnis antaŭdiveni, kion Nazario estis dironta.

— Ĉu oni ne elportos el la malliberejo iujn aliajn korp-ojn? — demandis Petronio.

— En la hodiaŭa nokto mortis ĉirkaŭ dudek homoj, kaj ĝis la vespero mortos ankoraŭ dekelkaj, — respondis la knabo. — Ni devas iri kun la tuta aro, sed ni malrapidos por resti malantaŭe. Ĉe la unua vojturniĝo mia kamarado intence eklamos. Tiamaniere ni restos longe post la aliaj. Vi atendu nin apud la malgranda templo de Libitino. Dio nur donu nokton plej malluman.

— Dio donos, — diris Nigro. — Hieraŭ la vespero estis luma kaj poste subite eksplodis fulmotondro. Hodiaŭ la ĉielo denove estas klara, sed la aero — sufoka de la mateno. Ĉiunokte okazados nun pluvoj kaj fulmotondroj.

— Ĉu vi iras sen lumoj? — demandis Vinicio.

— Nur fronte oni portas torĉojn. Vi estu, por ĉia okazo, apud la templo de Libitino tuj, kiam nur krepuskiĝos, kvankam ni elportas ordinare la kadavrojn nur ĉirkaŭ la noktomezo.

Ili eksilentis; oni aŭdis nur la rapidan spiradon de Vinicio. Petronio sin turnis al li.

— Mi diris hieraŭ, ke plej bone estus, se ni ambaŭ restus hejme. Nun mi tamen vidas, ke mi mem ne povus elteni ĉi tie... Cetere, se ĝi estus forkuro, oni devus entrepreni pli da gardemo, sed ĉar oni elportos ŝin, kiel mortintan, ŝajnas al mi, ke en nenies kapon venos eĉ plej eta suspekto.

— Jes! Jes! — respondis Vinicio, — mi devas esti tie. Mi mem eligos ŝin el la ĉerko...

— Kiam ŝi troviĝos en mia domo apud Korioloj, mi respondumos pri ŝi, — diris Nigro.

Per tio finiĝis la interparolo. Nigro iris en la gastejon, al siaj homoj. Nazario, preninte sub la tunikon sakon kun oro, revenis la malliberejon. Por Vinicio komenciĝis tago, plena je maltrankvilo, ekscito, timo kaj atendado.

— La afero devus sukcesi, ĉar ĝi estas bone planita, — parolis al li Petronio. — Pli bone ĉion pripensi ne estis eble. Ci devas ŝajnigi cin afliktita kaj vesti cin per malhela togo. La cirkoludojn tamen ne forlasu. Oni cin vidu ... Ĉio

estas tiel pripensita, ke ĝi ne povas malsukcesi. Sed vere! Ci ja plene fidas al cia farmisto, ĉu ne?

— Li estas kristano, — respondis Vinicio.

Petronio rigardis lin kun miro, poste li komencis movi la ŝultrojn kaj paroli kvazaŭ al si mem:

— Je Polukso! Kiel ĝi tamen disvastiĝas! Kaj kiel ĝi kroĉas sin al la homaj animoj!... Sub tia premo la homoj tuj malkonfesus ĉiujn diojn romajn, grekajn kaj egiptajn. Strange tamen!... Je Polukso!... Se mi kredus, ke io en la mondo dependas ankoraŭ de niaj dioj, mi promesus nun al ĉiu po ses blankaj virbovoj, kaj al la kapitola Jovo dek du ... Sed ankaŭ ci ne avaru promesojn al cia Kristo...

— Mi donis al li mian animon, — respondis Vinicio.

Kaj ili disiris. Petronio revenis en la dormoĉambron. Vinicio dume iris rigardi de malproksime la malliberejon, kaj de tie direktis la paŝojn al la deklivo de la Vatikana monteto, ĝis la kabano de la fosisto, kie li ricevis la bapton el la manoj de Petro. Ŝajnis al li, ke en tiu kabano Kristo pli certe lin elaŭskultos ol en iu ajn alia loko, do retrovinte ĝin, li streĉis ĉiujn fortojn de sia dolorlaca animo en preĝo pri kompato kaj profundiĝis en ĝi tiel, ke li forgesis, kie li estas kaj kio al li okazas.

Jam posttagmeze rekonsciigis lin la sono de trumpetoj, aŭdiĝanta flanke de la cirko de Nerono. Li eliris tiam el



la kabano kaj komencis rigardi ĉirkaŭen per okuloj, kva-  
zaŭ ĵus vekigintaj el dormo. Ekstere estis varmego kaj si-  
lento, kiun interrompadis nur iafoje la bronzosono de la  
trumpetoj kaj senĉese — la senlaca ĉirpado de cikadoj. La  
aero iĝis sufoka; la ĉielo super la urbo estis ankoraŭ blua,  
sed en la direkto de la Sabena montaro amasiĝadis malal-  
te, ĉe la rando de la horizonto, malhelaj nuboj.

Vinicio revenis hejmen. En la atrio atendis lin jam Pe-  
tronio.

— Mi estis sur Palatino, — li diris. — Mi vidigis min tie  
intence kaj mi eksidis eĉ por kubludi. Ĉe Anicio okazos  
ĉi-vespere festeno; mi anoncis, ke ni venos, sed nur post  
la noktomezo, ĉar antaŭe mi devas fortiĝi per dormo.  
Efektive, mi ĉeestos, kaj bone estus, se ankaŭ ci ĉeestos.

— Ĉu ne venis iaj novaĵoj de Nigro, aŭ de Nazario? —  
demandis Vinicio.

— Ne. Ni vidos ilin nur noktomeze. Ĉu ci rimarkis, ke  
pretiĝas fulmotondro?

— Jes.

— Morgaŭ devas okazi spektaklo kun krucumitaj kris-  
tanoj, eble tamen pluvo malhelpos.

Dirinte tion, li proksimiĝis kaj, tuŝinte la ŝultron de  
Vinicio, diris:

— Ŝin tamen ci ne vidos sur kruco, sed en Korioloj. Je

Kastoro! Mi ne fordonus la momenton, en kiu ni ŝin liberigos, por ĉiuj gemoj de Romo. La vespero jam estas proksima.

Efektive la vespero proksimiĝadis, kaj la mallumo komencis vuali la urbon pli frue ol ordinare, kaŭze de la nuboj, kiuj kovris la tutan horizonton. Je la vesperiĝo falis abunda pluvo, kiu, vaporante sur la ŝtonoj, brulantaj de la tuttaga varmego, plenigis per nebulo la stratojn de la urbo. Poste alterne jen iĝadis kviete, jen denove pasadis mallongaj pluvoj.

— Ni rapidu, — diris fine Vinicio, — pro la fulmotondro povas okazi, ke oni pli frue elportos la korpojn el la malliberejo.

— Ni jam iru, — respondis Petronio.

Kaj surmetinte gaŭlajn mantelojn kun kapuĉoj, ili eliris tra ĝardena pordeto sur la straton. Petronio armis sin krome per mallonga roma ponardo, nomata *siko*, kiun li ĉiam kunprenadis en noktaj ekskursoj.

La stratoj pro la fulmotondro estis senhomaj. De tempo al tempo fulmo disŝiris la nubojn, lumigante per akra brilo freŝajn murojn de novkonstruitaj aŭ nur konstruataj domoj kaj malsekajn ŝtonojn, per kiuj estis pavimitaj la stratoj. Ĉe tia lumo ili ekvidis fine, post sufiĉe longa vojo, termonteton, sur kiu staris malgranda templo de Libitino,

kaj apud la monteto grupon, konsistantan el muloj kaj ĉevaloj.

— Nigro! — vokis Vinicio mallaŭte.

— Mi estas, sinjoro! — aŭdiĝis voĉo en la pluvo.

— Ĉio estas preta?

— Jes, mia kara. Tuj kiam mallumiĝis, ni estis ĉi-loke.

Sed rifuĝu sub la remparon, aŭ vi trae malsekiĝos. Kia fulmotondro! Mi supozas, ke hajlos.

La timo de Nigro montriĝis prava, ĉar baldaŭ venis hajlo, komence eta, poste ĉiam pli dika kaj densa. La aero tuj malvarmiĝis.

Kaj ili, starante sub la remparo, ŝirmitaj kontraŭ la vento kaj hajleroj, interparolis per mallaŭtaj voĉoj.

— Eĉ se iu nin ekvidos, — parolis Nigro, — venos al lina suspekto, ĉar ni aspektas kiel homoj, kiuj volas trateni la fulmotondron. Sed mi timas, ke oni prokrastos la elportadon de la kadavroj ĝis morgaŭ.

— La hajlo ne daŭros longe, — diris Petronio. — Ni devas atendi, eĉ ĝis la tagiĝo.

Ili atendis efektive, aŭskultante, ĉu atingos ilin eĥo de la portantaro. La hajlo pasis, vere, sed tuj poste komencis muĝi pluvego. Iafoje ekblovadis vento kaj portis de la Malbonodoraj Kavoj teruran odoron de la putrantaj korporetoj, kiujn oni enterigadis malprofunde kaj malzorge.

Subite Nigro diris:

— Mi vidas en la nebulo lumeton ... unu, du, tri ... Tio estas torĉoj!

Kaj li sin turnis al la sklavoj:

— Atentu, ke la muloj ne ronku!

— Ili venas! — diris Petronio.

Efektive, la lumoj iĝadis ĉiam pli klaraj. Post momento oni jam povis distingi la torĉoflamojn, balanciĝantajn pro la vento.

Nigro komencis krucosigni sin kaj preĝi. Dume la malserena procesio aliris pli proksimen kaj fine, atinginte la templeton de Libitino, ĝi haltis. Petronio, Vinicio kaj Nigro alpremis sin en silento al la remparo, ne komprenante, kion tio signifas. Sed la irantoj haltis nur por ĉirkaŭligi al si la vizaĝojn kaj buŝojn per tolpecoj, ŝirmante sin tiel de la sufoka malbonodoro, kiu ĉe la *puticuli* mem estis simple neelportebla; poste ili levis la portilojn kun la kadavroj kaj ekiris pluen.

Nur unu ĉerko haltis kontraŭ la templo. Vinicio ĵetis sin al ĝi, kaj post li Petronio, Nigro kaj du britaj sklavoj kun la portilo.

Sed antaŭ ol ili alkuris, en la mallumo aŭdiĝis dolorplena voĉo de Nazario:

— Sinjoro, oni transkondukis ŝin kun Urso en la Esk-

vilinan malliberejon ... Ni portas alian korpon! Kaj ŝin oni forprenis antaŭ la noktomezo!

Petronio revenis hejmen kun nubosimila vizaĝo kaj eĉ ne provis konsoli Vinicion. Li komprenis, ke pri eligo de Ligia el la subteraĵoj de Eskvilino eĉ revii estus vane. Li supozis, ke verŝajne tial oni ŝin transportis el Tulianumo, ke ŝi ne mortu pro febro kaj ne evitu la destinitan al ŝi amfiteatron. Sed ĝuste tio pruvis, ke oni zorgis ŝin kaj gardis pli atente ol aliajn. Petronio bedaŭris per la tuta animo same ŝin, kiel Vinicion, krom tio tamen incitis lin la penso, ke unuafoje en la vivo li malsukcesis en io kaj ke unuafoje li malvenkis en batalo.

«Fortuno ŝajnas min forlasi», li parolis al si, «sed la dioj eraras, se ili kredas, ke mi konsentos, ekzemple, tian vivon, kiel la lia.»

Ĉe tio li direktis la okulojn al Vinicio, kiu lin rigardis per larĝiĝintaj pupiloj.

— Kio estas al ci? Ĉu ci havas febron? — diris Petronio.

Kaj tiu respondis per ia stranga, rompita kaj malrapida voĉo, kvazaŭ malsana infano:

— Mi tamen kredas, ke li povas ŝin redoni al mi.

Super la urbo bruis ĉiam pli mallaŭte la lastaj resonoj

de la fulmotondro.

## Ĉapitro 58<sup>a</sup>

Tritaga pluvo, fenomeno escepta en Romo dum some-ro, kaj hajlo, falanta kontraŭ la natura ordo ne nur tage kaj vespere, sed ankaŭ nokte, interrompis la cirkoludojn. La popolon kaptis timo. Oni antaŭdiradis malbonan vin-berrickolton, kaj kiam iun posttagmezon tondro fandis sur Kapitolo bronzan statuon de Cereso, oni ordonis oferdon-ojn en la templo de Jovo la Savanto. La pastroj de Cereso disvastigis la famon, ke la kolero de la dioj sin turnis kon-traŭ la urbon pro tro malrapida punado de la kristanoj, la amasoj komencis do insisti, ke senkonsidere je la vetero oni rapidigu la daŭrigadon de la cirkoludoj, kaj ĝojo ekre-gis la tutan Romon, kiam oni anoncis fine, ke post tritaga interrompo la *ludus* rekomenciĝos.

Dume revenis ankaŭ la belvetero. La amfiteatro plen-iĝis per hommiloj de la tagiĝo ĝis la nokto kaj Nerono ve-nis same frue kun la vestaloj kaj la kortego. La spektaklo devis komenciĝi per interbatalo de la kristanoj, kiujn oni tiucele alivestis kiel gladiatorojn kaj donis al ili ĉiujn ar-milojn, kiujn uzadis profesiaj luktistoj por ataka kaj de-fenda batalo. Nun tamen la esperoj montriĝis trompaj. La kristanoj ĵetis sur la sablon la retojn, forkegojn, lancojn

kaj glavojn, anstataŭe ili komencis ĉirkaŭbraki unu alian kaj kuraĝigadi sin reciproke al persisto kontraŭ la torturoj kaj morto. Tiam profunda ofendo kaj indigno ekregis la korojn de la amasoj. Unuj riproĉis al ili malkuraĝon kaj timemon, aliaj asertis, ke ili ne volas batali spite al la popolo, pro malamo al ĝi kaj por ĝin senigi de la ĝojo, kiun kaŭzas ĉiam la vido de braveco. Fine laŭ la ordono de la imperiestro oni ellasis kontraŭ ilin verajn gladiatorojn, kiuj elbuĉis la genuantajn kaj sendefendajn kristanojn en unu momento.

Sed post la forigo de la kadavroj la spektaklo ĉesis esti batalo kaj ŝanĝis sin en vicon da mitaj scenoj, projektitaj de Nerono mem. Oni do vidis Herkulon, brulanta en fajro sur la monto Ojto<sup>315</sup>. Vinicio ekstremis pro la penso, ke la rolon de Herkulo oni destinis eble al Urso, sed videble ne venis ankoraŭ vico por la fidela servanto de Ligia, ĉar sur la ŝtiparo forbrulis alia kristano, tute nekonata al Vinicio. Tamen en la sekvinta sceno Ĥilono, kiun Nerono ne volis forpermesi el la cirko, ekvidis al li konatajn homojn.

Oni surscenigis la morton de Dedalo<sup>316</sup> kaj Ikaro. La rolon de Dedalo prezentis Eŭrikio, la maljunulo kiu iam

<sup>315</sup> Gr. Οἶτη (malnovgreke [ojtē], novgreke [iti]), lat. Ŭeta, Ojta — monto en la mezo de Greklando (38° 49' 43" N 22° 17' 19" Or).

<sup>316</sup> Dedalo, kiu laŭ aliaj mitoj sukcesis flugi de Kreto Sicilion, en la romaj amfiteatroj pereadis same, kiel Ikaro. (*Noto de la aŭtoro*)

donis al Ĥilono la signon de fiŝo; Ikaron prezentis lia filo, Kvarto. Oni levis ilin ambaŭ supren per speciala aparato kaj poste oni faligis ilin subite de grandega alteco, ĉe kio la juna Kvarto falis tiel proksime al la imperiestra podio, ke li surŝprucigis per sango ne nur la eksterajn ornamaĵojn, sed ankaŭ la purpurtegitan apogilon. Ĥilono ne vidis la falon, ĉar li fermis la okulojn, li aŭdis nur la obtuzan frapon de la korpo, kaj kiam post momento li ekvidis sangojn tuj apud si, li preskaŭ svenis duafoje.

Sed la scenoj ŝanĝiĝadis rapide. Malgloraj suferoj de virgulinoj, antaŭ la morto malvirgigataj de gladiatoroj, alivestitaj kiel bestoj, ĝojigis la korojn de la amaso. Oni vidis pastrinojn de Cibelo kaj Cereso, oni vidis Danaidinojn, oni vidis Dirkeon<sup>317</sup> kaj Pazifaon, oni vidis fine neaĝajn knabinojn disŝirataj de sovaĝaj ĉevaloj. La popolo aplaŭdis ĉiam novajn elpenaĵojn de Nerono, kiu, fiero pro ili kaj feliĉa pro la aplaŭdoj, ne forigis nun eĉ por unu momento la smeraldon de la okulo, rigardante la blankajn korpojn, disŝiratajn per fero, kaj la konvulsiajn tremojn de la viktimoj.

Oni tamen prezentis ankaŭ scenojn el la historio de la

<sup>317</sup> Gr. Δίρκη, lat. Drice — en greka mito: **Dirkeo**, la edzino de Teba reĝo Liko dum multaj jaroj molestis Antiopon, amatinon de Zeŭso. Kiam la filoj de Antiopo kaj Zeŭso elkreskis kaj konkeris Tebon, ili ekzekutis Dirkeon aliginte ŝin al la kornoj de sovaĝa bovo.



urbo. Post la virgulinaj oni vidis Mucion Scevolon<sup>318</sup>, kies mano, fiksita al tripiedo kun fajro, plenigis la amfiteatron perodoro de brulanta karno, sed kiu, kiel la vera Scevolino, staris sen ĝemo, kun okuloj levitaj supren kaj kun preĝa flustro sur la nigriĝintaj lipoj. Kiam oni lin finmortigis kaj fortrenis la korpon de la areno, sekvis la ordinara tagmeza interrompo de la spektaklo.

Nerono kun la vestaloj kaj aŭgustanoj forlasis la teatron kaj direktis sin en speciale starigitan grandegan skarlatan tendon, kie oni preparis por li kaj por la gastoj luksan matenmanĝon. La amasoj plejparte sekvis lian ekzemplon kaj, fluante eksteren, dismetis sin en pentrindaj grupoj apud la tendo por ripozigi la membrojn, lacajn pro la longa sidado, kaj konsumi manĝaĵojn, kiujn sklavoj abunde disportadis laŭ la imperiestra favoro. Nur la plej scivola, forlasinte siajn lokojn, venis malsupren sur la arenon kaj, tuŝante per la fingroj la sablon, glueman de la sango, diskutis kiel spertuloj kaj cirkamantoj pri tio, kio jam okazis kaj kio estis ankoraŭ okazonta. Baldaŭ tamen foriris ankaŭ la diskutantoj por ne malfruiĝi al la festeno; restis nur kelkaj homoj, kiujn retenis ne scivolo, sed kompato por la estontaj viktimoj.

<sup>318</sup> *Gājus Mūcius Scævōla* — heroo juna patricio, kiu intence metis sian manon en fajron por montri al Etruska reĝo malamika la kuraĝon de la romanoj (6<sup>a</sup> jc a.K.).

Tiuj kaŝis sin en la interbenkoj aŭ en la malpli altaj vicoj, kaj dume oni ebenigis la arenon kaj komencis fosi en ĝi kavojn, unu apud alia, vice, tra la tuta areno, de rando al rando, tiel ke ilia lasta vico troviĝis dekkelkajn paŝojn de la imperiestra podio. El ekster la cirko aŭdiĝadis bruo de la popolo, krioj kaj aplaŭdoj, kaj tie kun febra rapideco oni faris preparojn al novaj turmentoj.

Subite malfermiĝis la tuneloj kaj el ĉiuj malfermaĵoj, kondukantaj sur la arenon, oni komencis elpeli arojn da kristanoj, nudaj kaj portantaj krucojn sur la ŝultroj. Eksvarmis de ili la tuta amfiteatro. Kuris maljunuloj, klinitaj sub la pezo de la traboj, apud ili fortaĝaj viroj, virinoj kun disligitaj haroj, sub kiuj ili penis kaŝi sian nudecon, nemituraj knabetoj kaj tute malgrandaj infanoj. La krucoj estis pliparte, kiel ankaŭ la viktimoj, ornamitaj per floroj. La cirka servistaro, vipante la malfeliĉulojn per batiloj, devigis ilin meti la krucojn apud la pretaj kavoj kaj mem vicigi apude. Tiel devis pereii tiuj, kiujn pro manko de tempo oni ne elpuŝis sur la arenon viktimo al la hundoj kaj sovaĝaj bestoj. Nun kaptis ilin nigraj sklavoĵoj kaj, metante la viktimojn dorse sur la trabojn, komencis alnajli iliajn manojn al la krucbrakoj fervore kaj rapide, por ke la popolo, reveninte post la interrompo, trovu jam ĉiujn krucojn starigitaj. En la tuta amfiteatro aŭdiĝis nun la frapbruo de

marteloj, kies eĥoj rebatis sin de la pli altaj vicoj, atingis eĉ la placon, ĉirkaŭantan la amfiteatron, kaj venis eĉ sub la tendon, en kiu la imperiestro gastigis la vestalojn kaj la korteganojn. Tie oni trinkis vinon, ŝercis pro Ĥilono kaj flustris strangajn vortojn en la orelojn de la pastrinoj de Vesto; sur la areno dume svarmis laboro, najloj profundigadis en la manojn kaj piedojn de la kristanoj, grincis la fosiloj, ebenigantaj per tero la kavojn, en kiujn oni metis la krucojn.

Sed inter la viktimoj, por kiuj nur post momento devis veni la vico, estis Krispo. La leonoj ne havis tempon lin disŝiri, do oni destinis al li krucon, kaj li, ĉiam preta al morto, ĝojis, pensante, ke venas lia horo. Li aspektis hodiaŭ alie, ĉar lia seka korpo estis tute nudigita, nur hedera zonaĵo kovris liajn koksojn, kaj sur la kapo li havis kronon el rozoj. Sed en liaj okuloj brilis ĉiam la sama, nevenkbla energio kaj la sama vizaĝo, severa kaj fanatika, rigardis el sub la kronaĵo. Ne ŝanĝiĝis ankaŭ lia koro, ĉar kiel iam en la tunelo, li minacis dian koleron al la kunfratoj, ĉirkaŭkudritaj per feloj, same ankaŭ hodiaŭ li admonis ilin severe, anstataŭ konsoli.

— Danku al la Savinto, — li parolis, — ke li permesas al vi morti en la sama maniero, kiel li mem mortis. Eble parto de viaj kulpoj estos al vi pardonita pro tio, tremu ta-

men, ĉar la justeco devas esti plenumita kaj egalan rekompencon ne povas ricevi malvirtuloj kaj virtuloj.

Kaj liajn vortojn akompanis la resonado de la marteloj, per kiuj oni alnajladis la manojn kaj piedojn de la viktimoj. Ĉiam pli da krucoj staris sur la areno, kaj li, turninte sin al la aro de tiuj, kiuj staris ankoraŭ, ĉiu ĉe sia lignaĵo, parolis plu:

— Mi vidas malfermitan ĉielon, sed mi vidas ankaŭ abismon malfermitan... Mi mem ne scias, kiel mi respondos por mia vivo antaŭ la Sinjoro, kvankam mi kredis kaj malamis malbonon, kaj ne morton mi timas, sed leviĝon el mortintoj, ne torturon, sed juĝon, ĉar venas la tago de l' kolero...

Tiam subite el inter la pli proksimaj benkoj aŭdiĝis iu voĉo trankvila kaj solena:

— Ne la tago de l' kolero, sed la tago de l' kompatado, la tago de l' savo kaj feliĉo, ĉar mi diras al vi, ke Kristo akceptos vin ĉiujn, konsolos kaj sidigos ĉe sia dekstra flanko. Fidu, ĉar jen la ĉielo malfermiĝas antaŭ vi.

Je tiuj ĉi vortoj ĉiuj okuloj sin turnis al la benkoj; eĉ tiuj, kiuj jam pendis sur la krucoj, levis la palajn, martirajn kapojn kaj komencis rigardi al la parolanto.

Kaj ĉi tiu proksimiĝis al la barilo, ĉirkaŭanta la arenon, kaj komencis krucosigni ilin.

Krispo etendis al li la brakon, kvazaŭ volante lin admoni, sed, ekvidinte lian vizaĝon, li mallevis la manon, poste liaj genuoj fleksiĝis kaj la buŝo elflustris:

— Paŭlo la apostolo!

Je grandega miro de la cirka servistaro genuiĝis ĉiuj, kiujn oni ĝis nun ne alnajlis, kaj Paŭlo el Tarso sin turnis al Krispo, dirante:

— Krispo, ne minacu al ili, ĉar jam hodiaŭ ili estos kun ci en la paradizo. Ci opinias, ke ili povas esti kondamnitaj? Sed kiu ilin kondamnos? Ĉu tion faros Dio, kiu oferis pro ili sian Filon? Ĉu Kristo, kiu mortis pro ilia savo, kiel ili mortas pro lia nomo? Kaj kiel povas kondamni Tiu, kiu amas? Kiu kulpigos la elektitojn de Dio? Kiu diros pri tiu ĉi sango: Malbenita?

— Sinjoro, mi malamamis malbonon, — respondis la maljuna pastro.

— Kristo ordonis ami la homojn pli multe ol malami malbonon, ĉar la fundamento de lia instruo estas amo, ne malamo.

— Mi pekis en la horo de la morto, — respondis Krispo.

Kaj li komencis bati sian bruston.

Subite administranto de la benkoj proksimiĝis al la apostolo kaj demandis:

- Kiu estas ci, kiu parolas al la kondamnitaj?
- Roma civitano, – respondis trankvile Paŭlo.

Poste, turninte sin al Krispo, li diris:

- Fidu, ĉar difavora estas ĉi tiu tago, kaj mortu en paco, servanto de Dio.

Du negroj proksimiĝis en ĉi tiu momento al Krispo por meti lin sur la trabojn, sed li rigardis ankoraŭ fojon ĉirkaŭen kaj ekkriis:

- Fratoj miaj, preĝu pro mi!

Kaj lia vizaĝo perdis la kutiman severecon, la ŝtonaj trajtoj alprenis la esprimon de trankvilo kaj dolĉeco. Li mem etendis la manojn laŭlonge de la krucbrakoj, por faciligi la laboron, kaj, rigardante rekten en la ĉielon, komencis preĝi fervore. Li ŝajnis nenion senti, ĉar kiam la najloj enprofundiĝadis en liajn manojn, plej eta tremo ne ekskuis lian korpon, nek aperis sur lia vizaĝo ia dolorgrimaco: li preĝis, dum oni alnajlis liajn piedojn, li preĝis, dum oni levis la krucon kaj piedpremis la teron ĉirkaŭe.

Nur kiam la amasoj kun rido kaj ekkrioj komencis plenigi la amfiteatron, la brovoj de la maljunulo iom kuntiriĝis, kvazaŭ li kolerus, ke la idolana popolo konfuzas al li la trankvilon kaj pacon de la dolĉa morto.

Sed jam antaŭe oni levis ĉiujn krucojn tiel, ke sur la areno elkreskis kvazaŭ arbaro kun homoj, pendantaj sur

la arboj. Sur la brakojn de la krucoj kaj sur la kapojn de la martiroj faladis la brilo de la suno, kaj sur la arenon — densaj ombroj, formantaj kvazaŭ nigran, implikitan kradon, meze de kiu trabiladis flava sablo. Tio estis spektaklo, en kiu la tuta plezuro de la popolo konsistis en observado de la malrapida agonio. Sed neniam ĝis nun oni vidis tian densaĵon da krucoj. La areno estis tiel ŝtopita per ili, ke la cirka servistaro apenaŭ povis trapuŝi sin inter la krucoj. Ĉe la rando pendis plejparte virinoj, sed Krispon, kiel ĉefulon, oni starigis preskaŭ tuj antaŭ la imperiestra podio, sur grandega kruco, ĉirkaŭplektita de malsupre per lonicero. Neniu el la viktimoj mortis ankoraŭ, sed kelkaj el tiuj, kiujn oni alnajlis unue, svenis. Neniu ĝemis kaj neniu vokis kompaton. Kelkaj pendis kun kapoj klinitaj sur la ŝultrojn aŭ mallevitaj sur la brustojn, kvazaŭ lulitaj al dormo; aliaj kvazaŭ en medito, aliaj, rigardante ankoraŭ la ĉielon, movis mallaŭte la lipojn. En tiu terura arbaro da krucoj, en tiuj etenditaj korpoj, en la silento de la viktimoj estis tamen io terura. La popolo, kiu, sata post la festeno kaj ĝoja, eniradis la cirkon kun ekkrioj, eksilentis, ne sciante, sur kiu korpo fiksi la okulojn kaj kion pensi. La nudeco de la streĉitaj virinaj figuroj ĉesis eksciti ĝian voluptemon. Oni ne faris eĉ la kutimajn vetojn pri tio, kiu mortos pli baldaŭ, kiujn oni faradis ordinare, se sur la are-

no aperadis malpli granda nombro da kondamnitaj. Ŝajnis, ke ankaŭ Nerono enuas, ĉar, turninte la kapon flanken, li bonigadis sur si kolĉenon per maldiligenta gesto, kun vizaĝo apatia kaj dormema.

Subite la kontraŭe pendanta Krispo, kiu antaŭ momento havis okulojn fermitajn, kiel homo sveninta aŭ agonianta, malfermis ilin kaj komencis rigardi Neronon.

Lia vizaĝo alprenis denove esprimon tiel senindulgan kaj la rigardo ekflamis per tia fajro, ke la aŭgustanoj komencis flustri inter si, montrante lin per la fingroj, kaj fine Nerono mem turnis al li la atenton kaj pezmove levis la smeraldon al la okulo.

Sekvis kompleta silento. La okuloj de la spektantoj estis fiksitaj sur Krispo, kiu penis movi la dekstran manon, kvazaŭ li volus deŝiri ĝin de la trabo.

Post momento lia brusto ekŝvelis, la ripoj kurbiĝis eksteren kaj li komencis krii:

— Patrinmurdinto! Ve al ci!!

La aŭgustanoj, ekaŭdinte la senpardonan insulton, celitan al la sinjoro de la mondo antaŭ milhomaj amasoj, ne kuraĝis spiri. Ĥilono rigidiĝis. Nerono ekstremis kaj ellasis la smeraldon el la fingroj.

Ankaŭ la popolo retenis la spiron en la brusto. La voĉo de Krispo sonis ĉiam pli potence en la tuta



amfiteatro:

— Ve al ci, kiu murdis la edzinon kaj fraton, ve al ci, Antikristo! Abismo malfermiĝas antaŭ ci, morto etendas al ci siajn manojn kaj tombo cin atendas. Ve al ci, viva kadavro, ĉar ci mortos en teruro kaj estos kondamnita por eterne!!!

Kaj ne povante deŝiri la alnajlitan manon de la ligno, terure streĉita, timiga, dum la vivo ankoraŭ simila al skeleto, senpardona kiel la destino, li skuis la blankan barbon super la podio de Nerono, disŝutante kune per la movoj de la kapo rozajn petalojn el la plektaĵo metita sur lian kranion.

— Ve al ci, murdisto! Tropleniĝis cia mezuro kaj proksimiĝas cia horo!!!

Ĉe tio li faris lastan fortostreĉon: ŝajnis dum momento, ke li deŝiros la manon de la kruco kaj etendos ĝin minace super la imperiestro, sed subite liaj malgrasaj brakoj longiĝis ankoraŭ pli, la korpo malstreĉiĝis malsupren, la kapo falis sur la bruston, kaj li mortis.

En la kruca arbaro la malfortaj jam komencis endormiĝi por eterne.

## Ĉapitro 59<sup>a</sup>

— Sinjoro, — parolis Ĥilono, — nun la maro estas kiel olivoleo kaj la ondoj ŝajnas dormi ... Ni iru Aĥajon. Tie cin atendas la famo de Apolono, tie cin atendas laŭrokronoj, triumfoj, tie la homoj adoras cin kiel dion kaj la dioj cin akceptos kiel sian egalulon, dum ĉi tie...

Kaj li interrompis, ĉar lia malsupra lipo komencis tremi tiel forte, ke la vortoj ŝanĝiĝis en nekompreneblajn sonojn.

— Ni iros, kiam la cirkoludoj estos finitaj, — respondis Nerono. — Mi scias, ke eĉ nun kelkaj jam nomas la kristanojn *innoxia corpora*.<sup>319</sup> Se mi forveturus, komencus ĝin ripeti ĉiuj. Kial ci timas, putra fungo?

Dirinte ĉi tion, li sulkigis la frunton, sed komencis rigardi Ĥilonon per demandaj okuloj, kvazaŭ atendente de li klarigon, ĉar li mem nur ŝajnis trankvilon. Dum la lasta spektaklo li mem ektimis la vortojn de Krispo kaj, reveninte hejmen, ne povis endormiĝi pro furiozo kaj honto, sed kune pro timo. Subite la superstiĉa Vesteno, kiu aŭs-

---

<sup>319</sup> Du signifoj:

a) Laŭvorte: «senkulpaj, sendanĝeraj korpoj» — do, ĉi-okaze «senkulpaj viktimoj».

b) Frutempa (poste forlasita) nomo de la kristanoj (la prapekon de kies korpoj forlavis Kristo).

kultis silente ilian interparolon, rigardis ĉirkaŭen kaj diris per mistera voĉo:

— Aŭskultu, sinjoro, la vortojn de ĉi tiu maljunulo... en tiuj kristanoj estas io stranga... Ilia dio donas al ili facilan morton, sed li povas esti venĝema...

Je tio ĉi Nerono diris rapide:

— Ne mi aranĝas la cirkoludojn, sed Tigeleno.

— Jes! Mi! — respondis Tigeleno, kiun atingis la respondo de Nerono. — Mi ilin aranĝas, kaj mi mokas ĉiujn kristanajn diojn. Vesteno, ho sinjoro, estas veziko, plumblovita per superstiĉoj, kaj ĉi tiu brava greko estus preta morti pro timo ĉe la vido de kokino, hirtiĝinta por defendi siajn idojn.

— Bone, — diris Nerono, — sed de nun ordonu fortranĉi al la kristanoj la langojn, aŭ ŝtopi iliajn buŝojn.

— Ŝtopos ilin fajro, ho dia.

— Ve al mi! — ekĝemis Ĥilono.

Sed Nerono, kiun kuraĝigis la maltima certeco de Tigeleno, komencis ridi kaj diris, montrante la maljunan grekon:

— Rigardu, kiel aspektas praido de Aĥilo!

Efektive Ĥilono aspektis terure. La lastaj haroj sur lia kranio tute blankiĝis, en la vizaĝo ŝtoniĝis la esprimo de terura maltrankvilo, timo kaj premiteco. Iafoje li ŝajnis

konsternita kaj duone konscia. Ofte li ne respondadis al demandoj, alifoje li iĝadis kolera kaj tiel aroganta, ke la aŭgustanoj preferis lin ne inciti.

Tia momento trafis lin ankaŭ nun.

— Faru al mi, kion vi volas, sed al la cirkoludoj mi ne plu iros! — li ekkriis malespere, klakante per la fingroj.

Nerono rigardis lin momente kaj, turninte sin al Tigeleno, diris:

— Zorgu, ke en la ĝardenoj ĉi tiu stoikisto estu proksime al mi. Mi volas vidi, kiel impresos lin niaj torĉoj.

Ĥilono ektimis la minacon, sonantan en la voĉo de Nerono.

— Sinjoro, — li diris, — mi vidos nenion, ĉar mi ne vidas nokte.

Kaj Nerono respondis kun terura rideto:

— La nokto estos luma, kiel tago.

Poste li sin turnis al aliaj aŭgustanoj, kun kiuj li komencis paroli pri vetkuroj, kiujn li intencis aranĝi en la fino de la cirkoludoj.

Al Ĥilono proksimiĝis Petronio kaj, tuŝinte lian ŝultron, diris:

— Ĉu mi ne diris al ci? Ci ne eltenos.

Kaj tiu respondis:

— Mi volas ebriiĝi...

Kaj li etendis sian tremantan manon al pokalo kun vino, sed ne povis ĝisporti ĝin al la buŝo, kion vidante, Vesteno forprenis de li la vazon kaj poste, alŝovinte sin proksimen, demandis kun vizaĝo scivola kaj timigita:

— Ĉu persekutas cin Furioj? Diru?...

La maljunulo rigardis lin dum kelka tempo kun malfermita buŝo, kvazaŭ li ne komprenus la demandon, kaj komencis palpebrumi.

Kaj Vesteno ripetis:

— Ĉu persekutas cin Furioj?

— Ne, — respondis Ĥilono, — sed nokto estas antaŭ mi.

— Kiel, nokto?... La dioj cin kompatu! Kiel, nokto?

— Nokto terura kaj netravedebla, en kiu io movas sin kaj iras al mi. Sed mi ne scias, kio, kaj mi timas.

— Ĉiam mi estis certa, ke ili estas sorĉistoj. Ĉu ci vidas ion en sonĝoj?

— Ne, ĉar mi ne endormiĝas. Mi ne supozis, ke oni ilin tiel punos.

— Ĉu ci ilin bedaŭras?

— Por kio ci verŝas tiom da sango? Ĉu ci aŭdis, kion diris tiu krucumito? Ve al ni!

— Mi aŭdis, — respondis mallaŭte Vesteno. — Sed ili estas bruligistoj.

— Malvere!

— Kaj malamikoj de la homa gento.

— Malvere!

— Kaj akvovenenistoj.

— Malvere!

— Kaj infanmurdistoj...

— Malvere!

— Kiel do? — demandis Vesteno kun miro. — Ci ja mem diris tion kaj transdonis ilin en la manojn de Tigele-  
no!

— Tial ĉirkaŭprenis min nokto kaj morto venas al mi... Iafoje ŝajnas al mi, ke mi jam mortis, kaj ankaŭ vi ĉiuj.

— Ne! La mortontoj estas ili, kaj ni vivas. Sed diru al mi, kion ili vidas, mortante?

— Kriston...

— Tio estas ilia dio? Ĉu li estas potenca dio?

Sed Ĥilono respondis per demando:

— Kio estas tiuj torĉoj, kiuj brulos morgaŭ en la ĝardenoj? Ĉu ci aŭdis, kion diris la imperiestro?

— Mi aŭdis kaj scias. Tiajn kondamnitojn oni nomas *sarmentitii* kaj *semaxii*... Oni vestos ilin per dolortunikoj, trasorbigitaj per rezino, alligos ilin al palisoj kaj fajrigos ... Ke nur ilia dio ne faligu sur la urbon iajn terurajn bat-

ojn ... *Semaxii!* Terura torturo!

— Mi preferas tion, ĉar oni ne verŝos sangon, — respondis Ĥilono. — Ordonu al sklavo levi la pokalon al mia buŝo. Mi volas trinki, sed mi disverŝas la vinon, ĉar mia mano tremas pro maljuneco...

Ankaŭ aliaj dume interparolis pri la kristanoj. La maljuna Domicio Afro mokis ilin.

— Estas da ili tia amaso, — li parolis, — ke ili povus esti civilan militon; ĉu vi memoras, ke oni timis, ĉu ili sin defendos. Sed ili mortas, kiel ŝafoj.

— Ili nur provu alie! — diris Tigeleno.

Je tio ekparolis Petronio:

— Vi eraras. Ili defendas sin.

— Kiel nome?

— Per pacienco.

— Tio estas nova rimedo.

— Sendube. Sed ĉu vi povas diri, ke ili mortas tiel, kiel simplaj krimuloj? Ne! Ili mortas tiel, kvazaŭ krimuloj estus tiuj, kiuj kondamnis ilin al la morto, tio estas ni kaj la tuta roma popolo.

— Kiaj sensencaĵoj! — ekkriis Tigeleno.

— *Hic abdera*.<sup>β20</sup> — respondis Petronio.

Sed aliaj, frapitaj per la trafeco de lia rimarko, komen-

<sup>320</sup> Esprimo, signifanta: «Jen la plej granda stultulo». (*Noto de la aŭtoro*) (*Abdera*, Tracuja urbo; laŭ Juvenalo: patrujo de malsaĝuloj kaj kruduloj.)

cis rigardi lin kun miro kaj ripeti:

— Vere! Io diferenca kaj stranga estas en ilia morto.

— Mi diras al vi, ke ili vidas sian dion! — ekkriis Vesteno deflanke.

Tiam kelkaj aŭgustanoj sin turnis al Hîlono.

— He, maljunulo, ci ilin bone konas: diru al ni, kion ili vidas?

Kaj la greko, kraĉinte la vinon sur la tunikon, respondis:

— Leviĝon el mortintoj!

Kaj li komencis tremegi tiel, ke la gastoj, sidantaj pli proksime, eksplodis per laŭta rido.

## Ĉapitro 60<sup>a</sup>

De kelkaj tagoj Vinicio pasigadis la noktojn ekster la domo. En la kapon de Petronio venadis la penso, ke eble li denove preparis ian planon kaj laboras por liberigi Ligian el la Eskvilina malliberejo, li volis tamen pri nenio demandi por ne alporti malfeliĉon al la penado. Ankaŭ ĉi tiu eleganta skeptikulo iĝis certagrade superstiĉa, aŭ pli ĝuste, de kiam li ne sukcesis elrabi la knabinon el la Mamertina subteraĵo, li ĉesis fidi al sia stelo.

Cetere ankaŭ nun li ne esperis bonan rezulton de la penado de Vinicio. La Eskvilina malliberejo, aranĝita al-



bezone el la keloj de la domoj, kiujn oni detruis por haltigi la brulon, ne estis vere tiel terura, kiel la malnova Tullianumo apud Kapitolo, sed aliflanke ĝi estis centoble pli gardata. Petronio bonege komprenis, ke oni transkondukis tien Ligian nur tial, ke ŝi ne mortu kaj ne evitu la amfiteatron, li povis do facile konjekti, ke ĝuste pro tiu kaŭzo oni gardas ŝin sendube, kiel la pupilon de la okulo.

«Evidente, — li parolis al si, — Nerono kaj Tigeleno destinas ŝin por ia spektaklo speciala, pli terura ol ĉiuj, kaj Vinicio pli facile mem pereos, ol li sukcesos ŝin liberigi.»

Tamen ankaŭ Vinicio perdis la esperon, ke li povos ŝin liberigi. Nun tion fari povis nur Kristo. La celo de la juna tribunuso estis jam nur povi vidadati ŝin en la malliberejo.

De kelka tempo ne lasis lin en trankvilo la penso, ke Nazario tamen penetris en la Mamertinan malliberejon, kiel dungito por elportado de kadavroj, li do decidis provi tiun rimedon.

La estro de la Malbonodoraj Kavoj, subaĉetita per grandega sumo, akceptis lin fine en sian servan anaron, kiun li sendadis ĉiunokte por forpreni la kadavrojn el la malliberejoj. La danĝero, ke Vinicio povus esti rekonita, estis efektive malgranda. Ŝirmis lin kontraŭ tio: la nokto,

la sklava vesto kaj la malbona lumigiteco de la malliberejoj. Al kiu povus cetere veni la ideo, ke patricio, nepo kaj filo de konsuloj, povis troviĝi inter la tombistaro, elmetita al la haladzoj de la malliberejoj kaj de la Malbonodoraj Kavoj, kaj entreprenis la laboron, al kiu devigadis homojn nur sklaveco aŭ ekstrema mizero?

Sed li, kiam venis la sopirata vespero, kun ĝojo zonis la koksojn, ligis ĉirkaŭ la kapo tolpecon, sorbigitan per terbinto, kaj kun batanta koro iris kun aro da aliaj sur Eskvilinon.

La pretoriaj gardoj faris al ili neniajn malfacilaĵojn, ĉar ĉiuj estis provizitaj je konformaj *teseroj*, kiujn la centuriestro ekzamenis ĉe la lumo de lanterno. Post momento malfermiĝis antaŭ ili la grandega pordo kaj ili eniris.

Vinicio ekvidis antaŭ si vastan, arkplafonan kelon, el kiu oni pasadis en vicon da aliaj. Malfortaj meĉlampoj lumigadis la internon, plenegan je homoj. Kelkaj el ili kuŝis ĉe la muroj en profunda dormo, aŭ eble mortintaj. Aliaj svarmis ĉirkaŭ grandega vazo kun akvo staranta en la mezo, el kiu ili trinkis, kiel homoj konsumataj de febro. Aliaj sidis sur la tero kun kubutoj apogitaj sur la genuoj, kun kapoj en la manoj; tie kaj ie dormis infanoj, alpremitaj al la patrinoj. Ĉirkaŭe oni aŭdis jen ĝemojn kaj laŭtan

rapidan spiradon de malsanuloj, jen plorojn, jen flustrojn de preĝo, jen duonvoĉajn kantojn, jen malbenojn de la gardistoj. En la subteraĵo regis kadavraodoro kaj interpremo. En la krepuskaj profundaĵoj svarmis malhelaj figuroj, kaj pli proksime, ĉe la flagrantaj flametoj, oni vidis vizaĝojn palajn, teruritajn, kaviĝintajn kaj malsatajn, kun okuloj senbrilaj aŭ flamantaj de febro, kun bluetaj buŝoj, kun torentoj da ŝvito sur la fruntoj kaj kungluitaj haroj. En la anguloj laŭte deliris malsanuloj, aliaj petis akvon, aliaj, ke oni ilin konduku al morto. Kaj tamen ĝi estis malliberejo malpli terura ol la malnova Tulianumo.

Sub Vinicio ekŝanceliĝis la piedoj je tiu vido kaj en lia brusto ekmankis spiro. Je la penso, ke Ligia trovas sin meze de tiu mizero kaj teruro, la haroj hirtiĝis sur lia kapo kaj en la brusto morthaltis krio de malespero. La amfiteatro, la dentegoj de sovaĝaj bestoj, la krucoj — ĉio ĉi estis pli bona ol tiuj teruraj subteraĵoj, plenaj je kadavraodoro, kie petegaj homaj voĉoj ripetadis el ĉiuj anguloj: — Konduku nin al morto!

Vinicio enigis la ungojn en la manojn, ĉar li sentis, ke ekmankas al li forto kaj ke li perdas la konscion. Ĉio, kion li suferis ĝis nun, la tuta amo kaj doloro, ŝanĝiĝis en li en unu mortavidon.

Subite tuj apud li aŭdiĝis la voĉo de la estro de la Mal-

bonodoraj Kavoj:

— Kiom da kadavroj ci havas hodiaŭ?

— Ĉirkaŭ dek du, — respondis mallibereja gardisto, — sed ĝis la mateno estos pli multe, ĉar kelkaj jam stertoras ĉe la muroj.

Kaj li komencis plendi pri virinoj, ke ili kaŝas mortintajn infanojn por pli longe havi ilin apude kaj ne fordoni, ĝis kiam estas eble, en la Malbonodorajn Kavojn. Oni devas ekkonadi la kadavrojn nur laŭ la odoro, pro kio la aero, eĉ sen tio terura, malboniĝas ankoraŭ pli.

— Mi preferus, — li diris, — esti sklavo en kampara punlaborejo ol gardi tiujn dumvive putrantajn hundojn.

La estro de la Kavoj konsolis lin, asertante, ke lia ofico ne estas pli facila.

Dum tiu tempo Vinicio reakiris la senton de la realeco kaj komencis rigardi ĉirkaŭen tra la subteraĵo, en kiu li tamen vane serĉis per la okuloj Ligian, pensante ĉe tio, ke eble li tute ŝin ne vidos, dum ŝi ankoraŭ vivas. La malliberejo konsistis el dekelkaj keloj, kunigitaj inter si per freŝaj trafosaĵoj, kaj la tombejaj servistoj eniradis nur tien, el kie oni devis forpreni la korpojn de mortintoj, kaptis do lin timo, ke tio, kio kostis tiom da peno, eble utilis al li por nenio.

Feliĉe lia patrono helpis al li.

— La korpojn oni devas tuj elportadi, — li diris, — ĉar la malsano disvastiĝas ĉefe per la kadavroj. Alie mortos same vi, kiel la malliberuloj.

— Ni estas nur dek en ĉiuj keloj, — respondis la gardisto — kaj ni devas ja dormi.

— Do mi lasos al ci kvar miajn homojn, kiuj ĉirkaŭiros nokte la kelojn kaj atentos, ĉu iu mortis.

— Ni trinkfestos morgaŭ, se ci tion faros. Ĉiun kadavron oni portu al provisto, ĉar venis la ordono, ke oni trapiku la kolojn de la mortintoj, kaj poste — tuj en la Kavojn!

— Konsentite, sed ni trinkfestos! — diris la estro de la Kavoj.

Poste li elektis kvar homojn, inter ili ankaŭ Vinicion, kaj kun la ceteraj komencis meti la kadavrojn sur la portilojn.

Vinicio ekspiris. Li estis certa almenaŭ pri tio, ke li nun trovos Ligian.

Kaj unue li komencis atente ekzameni la unuan subteraĵon. Li enrigardis ĉiujn angulojn, kien preskaŭ ne atingis la brilo de la meĉlampo, li rigardis figurojn dormantajn ĉe la muroj sub ĉifonaj kovraĵoj, li rigardis la plej malsanajn, kiujn oni flankigis en apartan angulon, Ligian li povis tamen nenie trovi. En la dua kaj tria kelo lia serĉado restis

same senfrukta.

Dume la horo iĝis malfrua: la kadavroj estis elportitaj. La gardistoj, kuŝiĝinte en la koridoroj kunigantaj la kelojn, endormiĝis, la infanoj, lacaj de ploro, eksilentis, en la subteraĵo oni aŭdis nur spiradon de lacaj brustoj kaj kelkloke flustron de preĝo.

Vinicio eniris kun meĉlampro en kelon, kvaran laŭvice, multe malpli grandan, kaj levinte la lumon supren, komencis rigardi ĉirkaŭen.

Kaj subite li ekteremis, ĉar ekŝajnis al li, ke ĉe kradita malfermaĵo en la muro li vidas la grandegan figuron de Urso.

Do, forblovinte tuj la lumon, li proksimiĝis al li kaj demandis:

— Urso, ĉu tio estas ci?

La grandegulo turnis la kapon.

— Kiu ci estas?

— Ĉu ci ne rekonas min? — demandis la juna viro.

— Ci estingis la lampon, kiel mi povas cin rekoni?

Sed Vinicio ekvidis en tiu momento Ligian kuŝanta sur mantelo ĉe la muro, do, dirante nenion plu, li genuiĝis apud ŝi.

Urso rekonis lin tiam kaj diris:

— Gloro al Kristo! Sed ne veku ŝin, sinjoro.

Vinicio, genuante rigardis ŝin tra larmoj. Malgraŭ la mallumo li povis distingi ŝian vizaĝon, kiu ekŝajnis al li pala, kiel alabastro, kaj ŝiajn malgrasiĝintajn brakojn. Kaj je tiu vido kaptis lin amo, simila al ŝiranta doloro, skuanta la animon ĝis la fundo mem, kaj kune tiel plena je kompato, kulto kaj adoro, ke, falinte sur la vizaĝon, li komen- cis premi al la buŝo la randon de la mantelo, sur kiu kuŝis tiu kapo, kara al li super ĉio.

Urso dum longa tempo rigardis lin silente, fine li ta- men ektiris lin je la tuniko.

— Sinjoro, — li demandis, — kiel ci penetris ĉi tien, kaj ĉu ci venas por ŝin savi?

Vinicio levis la kapon kaj dum momento ankoraŭ luk- tis kun la kortuŝo.

— Montru al mi rimedon! — li diris.

— Mi pensis, ke ci ĝin trovos, sinjoro. En mian kapon venas nur unu...

Ĉe tio li turnis la okulojn al la kradita malfermaĵo, poste, kvazaŭ respondante al si mem, diris:

— Jes!... Sed tie staras soldatoj...

— Centurio da pretorianoj, — respondis Vinicio.

— Do — ni ne trairos!

— Ne trairos.

La ligio frotis la frunton kaj demandis refoje:

— Kiel ci eniris ĉi tien?

— Mi havas signon de la estro de la Malbonodoraj Kavoj...

Kaj subite li interrompis, kvazaŭ iu penso trabilus li an kapon.

— Je la morto de l' Savinto! — li komencis paroli per rapida voĉo. — Mi restos ĉi tie, kaj ŝi prenu mian signon, ligu la tolon ĉirkaŭ la kapo, kovru la ŝultrojn per la mantelo kaj eliru. Inter la tombistaj sklavoj estas kelkaj neaĝaj knaboj, do la pretorianoj ŝin ne rekonos, kaj kiam ŝi foje atingos la domon de Petronio, li savos ŝin!

Sed la ligio mallevis la kapon sur la bruston kaj respondis:

— Ŝi ne konsentus ĉi tion, ĉar ŝi cin amas, kaj krome ŝi estas malsana kaj ne povas stari propraforte.

Kaj post momento li aldonis:

— Se ci, sinjoro, kaj la nobla Petronio ne povis eligi ŝin el la malliberejo, kiu kapablos ĝin fari?

— Sole Kristo!

Poste ili ambaŭ eksilentis. La ligio pensis en sia simpla kapo: «Li ja povus nin ĉiujn savi, sed se li tion ne faras, ĝi signifas videble, ke venis la tempo de turmentoj kaj morto». Kaj li konsentis tion por si mem, sed ĝis la fundo de la animo li bedaŭris ĉi tiun infanon, kiu kreskis sur liaj



brakoj kaj kiun li amis super la vivo.

Vinicio denove genuiĝis apud Ligia. Tra la kradita malfermaĵo en la subterejon enŝtelis sin radioj de la luno kaj lumigis ĝin pli bone ol la sola meĉlampo, kiu flagris ankoraŭ super la pordo.

Subite Ligia malfermis la okulojn kaj, metinte siajn brulantajn manojn sur la manojn de Vinicio, diris:

— Mi vidas cin, — kaj mi sciis, ke ci venos.

Li ĵetis sin al ŝiaj manoj kaj komencis premi ilin al la frunto kaj koro, poste li levis ilin iom de la kuŝejo kaj apogis sur sia brusto.

— Mi venis, kara, — li diris. — Kristo cin gardu kaj savu, ho Ligia, mia amegata!

Kaj li ne povis paroli plu, ĉar lia koro komencis hurli en la brusto pro doloro kaj amo, kaj la doloron li ne volis al ŝi malkaŝi.

— Mi estas malsana, Marko, — respondis Ligia, — kaj ĉu sur la areno, aŭ ĉi tie, en la malliberejo, mi devas morti ... Sed mi preĝis, ke mi povu cin vidi antaŭe, kaj ci venis: Kristo min elaŭskultis!

Kaj dum li ne povis ankoraŭ eligi vortojn kaj nur premis ŝin al la brusto, ŝi parolis plu:

— Mi vidadis cin tra la fenestro el Tulianumo — kaj mi sciis, ke ci volis veni. Kaj nun la Savinto donis al mi mo-

menton da konscio, por ke ni povu adiaŭi unu la alian. Mi jam iras al li, Marko, sed mi amas cin kaj ĉiam mi cin amos.

Vinicio sin ekregis perforte, subpremis en si la doloron kaj komencis paroli per voĉo, kiun li penis igi trankvila:

— Ne, kara! Ci ne mortos. La apostolo ordonis kredi kaj promesis preĝi pro ci, kaj li konis Kriston, Kristo lin amis kaj nenion al li rifuzos ... Se ci devus morti, Petro ne ordonus al mi fidi, kaj li diris al mi: «Fidu!» — Ne, Ligia! Kristo kompatos min ... Li ne volas cian morton. Li ĝin ne allasos. Mi ĵuras al ci je la nomo de la Savinto, ke Petro preĝas pro ci!

Sekvis silento. La sola meĉlampo, pendanta super la pordo, estingiĝis, sed anstataŭe la lumo de la luno enfluadis tra la tuta malfermaĵo. En la kontraŭa angulo de la kelo infano ekploris kaj eksilentis. El ekstere aŭdiĝadis nur la voĉoj de pretorianoj, kiuj post sia gardovico ludis apud la muro je *scriptæ duodecim*.

— Ho Marko, — respondis Ligia, — Kristo mem vokis al la Patro: «Forigu de mi ĉi tiun kalikon da maldolĉaĵo», kaj tamen li ĝin eltrinkis, Kristo mem mortis sur la kruco, kaj nun miloj pro li pereas, kial do li ŝparu min solan? Kiu mi estas, Marko? Mi aŭdis Petron diri, ke ankaŭ li mortos

martire, kaj kio mi estas kontraŭ li? Kiam venis al ni la pretorianoj, mi timis morton kaj torturon, sed nun mi ne plu timas. Rigardu, kiel terura estas la malliberejo — kaj mi iras ĉielen. Pensu, ke ĉi tie estas la imperiestro, kaj tie — nia Savinto, bona kaj kompatema. Kaj ne ekzistas morto. Ci amas min, pensu do, kiel feliĉa mi estos. Ho, kara Marko, pensu, ke ci venos tien al mi.

Ĉe tio ŝi eksilentis, por kapti spiron en sian malsanan bruston, poste ŝi levis al la buŝo lian manon:

— Marko!

— Kio, kara?

— Ne ploru pro mi, kaj memoru, ke ci venos tien al mi. Mallonge mi vivis, sed Dio donis al mi cian animon. Do mi volas diri al Kristo, ke kvankam mi mortis kaj kvankam ci rigardis mian morton kaj kvankam ci restis en doloro, ci tamen ne blasfemis kontraŭ lia volo kaj ĉiam ci amas lin. Ci ja amas lin kaj elportos pacience mian morton? Ĉar tiam li nin kunigos, kaj mi cin amas kaj volas esti kun ci...

Ĉe tio denove ekmankis al ŝi spiro kaj per apenaŭ aŭdebla voĉo ŝi finis:

— Promesu tion al mi, Marko!...

Vinicio ĉirkaŭprenis ŝin per tremantaj manoj kaj respondis:

— Je cia sankta kapo! — mi promesas!

Tiam en la malgaja brilo de la luno lumiĝis ŝia vizaĝo. Ankoraŭfoje ŝi levis al la buŝo lian manon kaj flustris:

— Mi estas cia edzino!

Ekster la muro la pretorianoj, ludantaj je *scriptæ duodecim*, ekdisputis pli laŭte, sed la geamantoj forgesis pri la malliberejo, pri la gardoj, pri la tuta tero, kaj sentante en si reciproke anĝelajn animojn, komencis preĝi.

## Ĉapitro 61<sup>a</sup>

Dum tri tagoj, aŭ pli ĝuste tri noktoj, nenio konfuzis ilian trankvilon. Kiam la ordinara mallibereja laboro, konsistanta en apartigado de mortintoj disde vivantoj kaj de grave malsanaj disde pli sanaj, estis finita, kaj kiam la lacaj gardistoj kuŝiĝadis aldorme en la koridoroj, Vinicio eniradis la subteraĵon, en kiu estis Ligia, kaj restadis en ĝi tiel longe, ĝis tagiĝo penetradis tra la fenestrajn kradojn. Ŝi metadis la kapon sur lian bruston kaj per mallaŭtaj voĉoj ili interparolis pri amo kaj pri morto. Ili ambaŭ malgraŭvole, en la pensoj kaj interparoloj, eĉ en la deziroj kaj esperoj, foriĝadis ĉiam pli de la vivo kaj perdadis la senton pri ĝi. Ambaŭ estis kiel homoj, kiuj forvelinte en ŝipo de kontinento, ne vidas plu la bordon kaj foriĝas iom post iom en la senfinecon. Ambaŭ ŝanĝadis sin grade en spirit-

ojn malgajajn, plenajn je amo al si reciproke kaj al Kristo kaj pretajn forflugi. Iafoje nur en lia koro leviĝis ankoraŭ doloro, kiel ventego, iafoje ekbrilis, kiel fulmo, espero, naskita el amo kaj kredo je kompatemo de la krucumita Dio, sed ĉiutage ankaŭ li forŝiriĝadis ĉiam pli de la tero kaj fordonadis sin al morto.

Matene, kiam li eliradis el la malliberejo, li rigardis jam la mondon, la urbon, konatojn kaj ĉiujn aferojn, ligitajn kun la vivo, kvazaŭ songe. Ĉio ŝajnis al li fremda, malproksima, vanta kaj pereema. Ĉesis timigi lin eĉ la teruro de torturoj, ĉar li havis la senton, ke ĝi estas afero, tra kiu oni povas pasi kvazaŭ en medito, kun okuloj fiksitaj sur io alia. Al ambaŭ ŝajnis, ke la eterneco komencas jam preni ilin en posedon. Ili parolis nur pri la amo, pri tio, kiel ili amos sin reciproke kaj vivos kune, sed nur trans la tombo, kaj se iafoje iliaj pensoj turniĝis ankoraŭ al teraj aferoj, tio estis nur kiel la pensoj de homoj, kiuj, pretiĝante al malproksima vojaĝo, interparolas pri la vojaĝaj preparoj. Cetere ĉirkaŭis ilin tia silento, kia ĉirkaŭas du kolonojn starantajn ie en dezerta loko kaj forgesitajn. Ilia sola deziro estis jam nur, ke Kristo ilin ne disigu; kaj kiam ĉiu momento plifortigadis en ili ĉi tiun certecon, ili enamiĝis je li, kiel je ligonta ilin ĉenero, kiel je senfina felîco kaj senfina trankvilo. Sur la tero ankoraŭ defalis de ili

la polvo de la tero. La animoj iĝis en ili puraj, kiel larmoj. Sub la minaco de morto kaj suferoj, sur la mallibereja kuŝejo komenciĝis por ili la ĉielo, ĉar ŝi prenadis lin je la mano kaj kondukis, kvazaŭ mem jam ĉielenprenita kaj sankta, al la eterna fonto de la vivo.

Kaj Petronio miregis, vidante en la vizaĝo de Vinicio ĉiam pli grandan trankvilon kaj iajn strangajn brilojn, kiujn li ne vidis antaŭe. Iafoje naskiĝadis eĉ en lia menso supozoj, ke Vinicio trovis ian rimedon de savo, kaj estis al li malagrabla, ke la juna tribunuso ne malkaŝas al li la sekreton de siaj esperoj.

Fine, ne povante elteni plu, li diris al Vinicio:

— Ci nun aspektas alie, do ne faru sekretojn antaŭ mi, ĉar mi volas kaj povas helpi cin: ĉu ci elplanis ion?

— Mi elplanis, — respondis Vinicio, — sed ci jam ne povas helpi min. Jen, post ŝia morto mi konfesos, ke mi estas kristano, kaj mi sekvos ŝin.

— Do ci havas nenian esperon?

— Mi havas. Kristo ŝin redonos al mi kaj mi disiĝos de ŝi neniam plu.

Petronio komencis paŝi tra la atrio kun la esprimo de senreviĝo sur la vizaĝo, poste li diris:

— Por tio oni ne bezonas vian Kriston, ĉar tiun saman servon povas fari al vi nia Tanatoso<sup>321</sup>.

Sed Vinicio ridetis malgaje kaj diris:

— Ne, mia kara, sed ci tion ne volas kompreni.

— Mi ne volas kaj ne povas, — respondis Petronio. —

Ne estas nun tempo por diskutoj, sed ĉu ci memoras, kion ci diris, kiam ni ne sukcesis eligi ŝin el Tulianumo? Mi perdis tiam ĉian esperon, kaj ci diris, kiam ni revenis hejmen: «Mi tamen kredas, ke Kristo povas ŝin redoni al mi». Li ŝin redonu al ci. Se mi ĵetus multekostan vazon en maron, kapablus ĝin redoni al mi neniu el niaj dioj; kaj se ankaŭ la via ne estas pli kapabla, mi ne komprenas, kial mi devus adori lin pli ol la malnovajn.

— Li redonos ŝin al mi.

Petronio movis la ŝultrojn.

— Ĉu ci scias, — li demandis, — ke morgaŭ oni lumigos per kristanoj la imperiestrajn ĝardenojn?

— Morgaŭ? — ripetis Vinicio.

Kaj kontraŭ la proksima tremiga realaĵo la koro ektemis en li pro doloro kaj teruro. Li ekpensis, ke ĝi estas eble la lasta nokto, kiun li povos pasigi kun Ligia, do, adiaŭinte Petronion, li iris rapide al la estro de la *puticuli* por preni sian signon.

Sed tie liaj esperoj montriĝis vanaj, ĉar la kavestro ne volis doni al li la signon.

<sup>321</sup> *Tanat(os)o* (gr. Θάνατος) — en la greka mitaro, dio de la morto kaj la morto mem.

— Pardonu, sinjoro, — li diris. — Mi faris por ci, kion mi povis, sed mi ne povas riski la vivon. Hodiaŭ nokte oni elkondukos la kristanojn al la imperiestraj ĝardenoj. La malliberejo estos plena je soldatoj kaj oficistoj. Se oni cin rekonas, pereus mi kaj miaj infanoj.

Vinicio komprenis, ke vane estus insisti. Ekbrilis al li tamen la espero, ke la soldatoj, kiuj vidadis lin antaŭe, eble enlasos lin eĉ sen la signo, do, kiam noktiĝis, li vestis sin, kiel ordinare, per diktola tuniko, ligis tolpecon ĉirkaŭ la kapo kaj iris al la pordo de la malliberejo.

Sed tiutage oni kontrolis la signojn eĉ pli precize ol ordinare, kaj plie, la centestro Sceveno, severa soldato, korpe kaj anime servanta la imperiestron, rekonis Vinicion.

Sed videble en lia ferkirasita brusto ardetis ia fajrero de kompatato por la homa malfeliĉo, ĉar, anstataŭ frapi la ŝildon per la lanco signe de alarmo, li kondukis Vinicion flanken kaj diris al li.

— Sinjoro, reiru hejmen. Mi rekonis cin: sed mi silentos, ne volante cin pereigi. Mi ne povas cin enlasi, sed reiru, kaj la dioj konsolu cian koron.

— Ci ne povas min enlasi, — diris Vinicio, — sed lasu min resti ĉi tie kaj vidi tiujn, kiujn oni elkondukos.

— Mia ordono ne malpermesas tion, — respondis Sce-



veno.

Vinicio stariĝis antaŭ la pordego kaj atendis, ke oni komencu elkonduki la kondamnitajn. Fine ĉirkaŭ la noktomezo vaste malfermiĝis la mallibereja pordego kaj aperis tutaj vicoj da malliberuloj: viroj, virinoj kaj infanoj, ĉirkaŭitaj de armitaj pretoriaj taĉmentoj. La nokto estis tre hela kaj plenluna, tiel ke oni povis distingi ne nur la figurojn, sed ankaŭ la vizaĝojn de la malfeliĉuloj. Ili iris popare, en longa, malgaja procesio kaj en silento, interrompata nur per tintado de la soldataj armiloj. Oni kondukis tiom da ili, ke ŝajnis, kvazaŭ ĉiuj keloj restos malplenaj.

En la fino de la irantaro Vinicio ekvidis klare Glaŭkon la kuraciston, sed nek Ligia, nek Urso estis inter la kondamnitaj.

## Ĉapitro 62<sup>a</sup>

Ne krepuskiĝis ankoraŭ, kiam la unuaj ondoj da popolo komencis jam enflui la imperiestrajn ĝardenojn. La amasoj, feste vestitaj, florkronitaj, gajaj, kantantaj kaj plejparte ebriaj iris rigardi la novan, imponan spektaklon. La ekkrioj: «*Semaxii! Sarmentitii!*» sonis sur la Kovrita strato<sup>322</sup>, sur la ponto Emilia kaj trans Tibero, sur la Triumfa Vojo, apud la cirko de Nerono kaj for, ĝis la Vatikana monteto. Oni vidadis en Romo jam antaŭe homojn bruligataj sur palisoj, sed neniam oni vidis tian nombron da kondamnitaj. Nerono kaj Tigeleno, volante fini pri la kristanoj kaj kune haltigi la epidemion, kiu el la malliberuloj disvastiĝadis ĉiam pli tra la urbo, ordonis malplenigi ĉiujn malliberejojn, tiel ke restis en ili apenaŭ kelkdek homoj, destinitaj por la fino de la cirkoludoj. Tial do la amasoj, pasinte la ĝardenajn pordegojn, mutiĝis pro miro. Ĉiuj aleoj ĉefaj kaj flankaj, kondukantaj meze de arbaj densaĵoj, ĉirkaŭ herbejoj, insuletoj, lagoj, lagetoj kaj terpecoj, surkreskitaj de floroj, estis borderitaj per peĉaj palisoj, al kiuj oni alligis kristanojn.

De pli altaj lokoj, kie la vidon ne ŝirmis arboj, oni po-

---

<sup>322</sup> Lat. *Via Tecta* — supozeble tegmentita (portika) kaj (aŭ) pavimita strato en la Marsa Kampo.

vis vidi tutajn vicojn da palisoj kaj korpoj, ornamitaj per floroj, per mirtaj folioj kaj hedero, tirantaj sin for, sur altaĵoj kaj ebenaĵoj, tiel malproksimen, ke dum la pli proksimaj ŝajnis kvazaŭ mastoj de ŝipoj, la lastaj prezentis sin al la okuloj, kiel koloraj tirsoj aŭ lancoj, enpikitaj en la teron. La amaso de la kondamnitoj superis la esperojn de la popolo mem. Oni povus pensi, ke iun tutan nacion oni ligis al la palisoj por amuzi Romon kaj Neronon. Aroj da spektantoj haltadis antaŭ apartaj mastoj, laŭgrade kiel interesis ilin la figuroj, la aĝo aŭ sekso de la viktimoj, rigardis la vizaĝojn, florkronojn, hederajn girlandojn, poste iris pluen, demandante sin mem kun miro: «Ĉu povis esti tiom da kulpuloj, aŭ kiel povis bruligi Romon infanoj, apenaŭ kapablaj paŝi propraforte?» Kaj la miro ŝanĝadis sin grade en maltrankvilon.

Dume krepuskiĝis kaj sur la ĉielo ekbrilis la unuaj steloj. Tiam apud ĉiu kondamnito ekstaris sklavo kun brulanta torĉo, kaj kiam la sono de trumpetoj aŭdiĝis en diversaj partoj de la ĝardenoj, signante la komencon de la spektaklo, ĉiu almetis flamon al la malsuproj de la palisoj.

Pajlo, kaŝita sub la floroj kaj surverŝita per peĉo, tuj ekbrulis per hela flamo, kiu, kreskante kun ĉiu momento, leviĝadis supren kaj lekis la piedojn de la viktimoj. La popolo eksilentis, tra la ĝardenoj eksonis unu grandega ĝe-

mo kaj dolorkrioj. Kelkaj el la viktimoj tamen, levante la kapojn al la stelriĉa ĉielo, komencis kanti gloro al Kristo. La popolo aŭskultis. Sed eĉ la plej malmolaj koroj pleniĝis per teruro, kiam de sur malpli grandaj mastoj korŝirantaj infanaj voĉoj komencis voki: «Panjo! Panjo!» kaj tremo trakuris eĉ ebriajn spektantojn eĉ la vido de tiuj kapetoj kaj senkulpaj vizaĝoj, torditaj pro doloro aŭ svenantaj en la fumo, kiu komencis sufoki la viktimojn. Kaj la flamo kreskis supren kaj trabruligadis ĉiam novajn kronojn el rozoj kaj hederoj. Disfajris la aleoj ĉefaj kaj flankaj, disfajris arbotufoj kaj herbejoj kaj floraj terpecoj, disbrilis la akvo en la lagetoj kaj lagoj, roziĝis la tremantaj folioj sur la arboj kaj iĝis lume, kiel en tago. Laodoro de la brulantaj korpoj plenigis la ĝardenojn, sed en la sama momento la sklavoj komencis ŝuti mirhon kaj aloon en incensilojn, speciale pretigitajn inter la palisoj. En la amaso aŭdiĝis tie kaj ie ekkrioj, oni ne scias ĉu de kompatato, aŭ de ravo kaj ĝojo, kaj ili kreskis ĉiumomente kune kun la fajro, kiu ĉirkaŭprenadis la palisojn, grimpis al la brustoj de la viktimoj, tordis per la brula spiro la harojn sur iliaj kapoj, ĵetadis vualojn sur iliajn nigriĝintajn vizaĝojn, kaj fine ŝprucis ankoraŭ pli alten, kvazaŭ triumfe kaj glorante tiun forton, kiu ordonis ĝin bruligi.

Sed ankoraŭ en la komenco de la spektaklo inter la

popolo aperis la imperiestro sur brilega cirka kvadrigo, jungita per kvar blankaj ĉevaloj, vestita mem per la kostumo de ĉaristo el la partio de la Verduloj, al kiu apartenis tiel li, kiel lia kortego. Post li sekvis aliaj veturiloj, plena je korteganoj en brilaj vestoj, senatanoj, pastroj kaj nudaj bakĥantinoj kun florkronoj sur la kapoj kaj kruĉoj da vino en la manoj, parte ebriaj kaj eligantaj sovaĝajn sonojn. Apud ili muzikistoj, alivestitaj kiel faŭnoj kaj satirusoj, ludis citrojn, formingojn, fajfilojn kaj kornojn. Sur aliaj veturiloj sidis matronoj kaj romaj junulinoj, ankaŭ ebriaj kaj duonnudaj. Apud la kvadrigoj ŝnurdancistoj skuis tirssojn, ornamitajn per rubandoj; aliaj batis tamburetojn, aliaj ŝutis florojn. La tuta brila sekvantaro, kriegante: *evoe!* antaŭeniĝadis sur la plej larĝa ĝardena vojo, meze de fumo kaj meze de la homaj torĉoj. Nerono, havante apude Tigelenon kaj Ĥilonon, per kies teruro li deziris amuzi sin, kondukis mem la ĉevalojn kaj, veturante paŝon post paŝo, rigardis la brulantajn korpojn kaj kune aŭskultis la ekkriojn de la popolo. Starante sur la alta, ora kvadrigo, ĉirkaŭite de homa ondo, kiu riverencis lin ĝis la piedoj, en la briloj de la fajro. kun ora laŭrokrono de cirka venkinto, li superkreskis la korteganojn, la amasojn, kaj ŝajnis grandegulo. Liaj monstraj brakoj, etenditaj por teni la kondukilojn, ŝajnis beni la popolon. En la vizaĝo kaj en la

duonfermitaj okuloj li havis rideton, kaj li brilis super la homoj, kiel la suno, aŭ kiel dio, terura, sed grandioza kaj potenca.

Iafoje li haltis por rigardi pli precize jen iun virgulinon, kies sino komencis siblokraki en la fajro, jen konvulsie torditan vizaĝon de infano, kaj denove li veturis pluen, kondukante post si la frenezan kaj senbridan sekvantaron. Iafoje li salutis la popolon, aŭ, klininte sin posten, kuntiradis la kondukilojn kaj interparolis kun Tigeleno. Fine, atinginte grandegan fontanon, starantan en la mezo de du kruciĝantaj vojoj, li deiris de la kvadrigo kaj, doninte signon al la akompanantoj, miksis sin kun la amaso.

Oni salutis lin per krioj kaj aplaŭdoj. La bakĥantinoj, nimfoj, senatanoj, aŭgustanoj, pastroj, faŭnoj, satirusoj kaj soldatoj ekĉirkaŭis lin tuj per freneza rondo, kaj li, havante unuflanke Tigelenon, aliflanke Hilonon, paŝis ĉirkaŭ la fontano, apud kiu brulis kelkdek torĉoj, haltante antaŭ ĉiu, farante rimarkojn pri la viktimoj, aŭ mokante la maljunan grekon, sur kies vizaĝo bildigis sin senlima malespero.

Fine ili ekstaris antaŭ alta masto, ornamita per mirtoj kaj ĉirkaŭplektita per konvolvuloj. Ruĝaj flamlangoj atingis la genuojn de la viktimo, sed la vizaĝon oni ne povis distingi, ĉar freŝaj brulantaj branĉetoj vualis ĝin per fu-

mo. Post momento tamen facila nokta vento forblovis la fumojn kaj malkovris kapon de maljunulo kun longa barbo falanta surbrusten.

Je tiu vido Ĥilono subite kuntordiĝis, kiel vundita rampaĵo, kaj el lia buŝo eliĝis krio, simila pli al grakado ol al homa voĉo:

— Glaŭko! Glaŭko!...

Efektive de sur la brulanta paliso rigardis lin Glaŭko la kuracisto.

Li vivis ankoraŭ. Lia vizaĝo estis dolorplena kaj klinita, kvazaŭ li volus lastfoje rigardi sian persekutanton, kiu lin perfidis, senigis je la edzino, je la infanoj, sendis kontraŭ lin murdonton, kaj kiam ĉio tio estis al li pardonita en la nomo de Kristo, ankoraŭfoje lin transdonis al torturistoj. Neniam unu homo faris al alia maljustaĵojn pli terurajn kaj pli sangajn. Kaj jen la viktimo brulis sur la peĉa paliso, kaj la persekutanto staris ĉe ĝiaj piedoj. La okuloj de Glaŭko ne deturnis sin de la vizaĝo de la greko. Iafoje vualis ilin la fumo, sed kiam la vento ĝin forblovis, Ĥilono vidis denove tiujn pupilojn, fiksitajn sur li. Li leviĝis kaj volis forkuri, sed ne povis. Subite ekŝajnis al li, ke liaj piedoj estas el plumbo kaj ke iu nevidebla mano retenas lin per superhoma forto antaŭ tiu ĉi paliso. Kaj li ŝtoniĝis. Li sentis nur ke io lin troplenigas, io elbordiĝas, ke sufiĉe li

havas da torturoj kaj sango, ke venas fino de la vivo kaj ke ĉio malaperas apude: la imperiestro, kaj la kortego, kaj la popolo, kaj ekĉirkaŭas lin nur ia senfunda, terura kaj nigra malpleno, en kiu li vidas nur ĉi tiujn okulojn de la martiro, vokantajn lin al juĝo. Kaj Glaŭko, klinante la kapon ĉiam pli malalten, rigardis senĉese. La ĉeestantoj divenis, ke inter tiuj ĉi homoj io okazas, sed rido morthaltis en iliaj buŝoj, ĉar en la vizaĝo de Ĥilono estis io terura: tordis ĝin tia timego kaj tia doloro, kvazaŭ la flamaĵoj langoj brulvundus lian propran korpon.

Subite li ŝanceliĝis kaj, etendinte la brakojn supren, vokis per terura, korŝira voĉo:

— Glaŭko! En la nomo de Kristo! Pardonu!!!

Ĉirkaŭe ekregis silento: tremo trakuris la ĉeestantojn kaj ĉies okuloj malgraŭvole leviĝis supren.

Kaj la kapo de la martiro moviĝis facile, poste oni ek-aŭdis de la mastosupro voĉon, similan al ĝemo:

— Mi pardonas!!...

Ĥilono sin ĵetis survizaĝen, hurlante, kiel sovaĝa besto, kaj preninte en ambaŭ manojn terpolvon, ĝin ŝutis sur sian kapon. Dume la flamoj ekŝprucis supren, ĉirkaŭprenis la bruston kaj la vizaĝon de Glaŭko, displektis mirtan kronon ĉirkaŭ lia kapo kaj kaptis rubandojn sur la supro de la paliso, kiu ekbrilis tuta per grandega, akra lumo.



Sed Hîlono leviĝis post momento kun vizaĝo tiel ŝanĝita, ke al la aŭgustanoj ŝajnis, kvazaŭ ili vidas alian homon. En liaj okuloj flamis neordinara brilo, de la sulkoplana frunto radiis ekstazo: la antaŭ momento kaduka greko aspektis nun kvazaŭ pastro, kiu, inspirite de sia dio, volas malkaŝi nekonatajn verojn.

— Kio estas al li? Li freneziĝis, — aŭdiĝis kelkaj voĉoj.

Sed li, turninte sin al la popolo kaj etendinte supren la dekstran brakon, komencis deklari, aŭ pli ĝuste kriegi, tiel laŭte, ke ne nur la aŭgustanoj, sed ankaŭ la amaso aŭdu alian voĉon:

— Roma popolo! Je mia morto mi ĵuras, ke pereas senkulpuloj, kaj la brulmetinto estas — ĉi tiu!!

Kaj per la fingro li almontris Neronon.

Sekvis momento da silento. La korteganoj rigidiĝis. Hîlono staris ĉiam kun etendita, tremanta brako kaj kun fingro turnita al Nerono. Subite ekregis konfuzo. La popolo, kvazaŭ ondo, puŝata de subita vento, ĵetis sin al la maljunulo, volante rigardi lin pli bone. Tie kaj ie aŭdiĝis la voĉoj: «Kaptu lin», aliloke: «Ve al ni!» En la amaso eksonis fajfoj kaj krioj: «Ahenobarbo! patrinmurdinto! Brulmetinto!» La malordo kreskis kun ĉiu momento. La bakĥantinoj, kriegante tutgorĝe, komencis rifuĝi sur la veturilojn. Subite kelkaj konsumitaj palisoj renversiĝis, disŝut-

ante ĉirkaŭen fajrerojn kaj pligrandigante la ĥaoson. Blinda, svarma ondo de popolo kaptis Ĥilonon kaj kunportis lin en la fundon de la ĝardeno.

Ĉie jam la palisoj komencis konsumiĝadi kaj faladi transverse de la stratoj, plenigante la aleojn per fumo, fajreroj, brulodoro de ligno kaj per la odoro de homa graso. Estingiĝadis la lumoj pli kaj malpli proksime. En la ĝardenoj mallumiĝis. La amasoj, maltrankvilaj, malserenaj kaj timigitaj sin premis al la pordegoj. La famo pri tio, kio okazis, pasadis de buŝo al buŝo, ŝanĝate kaj pligrandigate. Kelkaj rakontis, ke Nerono svenis, aliaj, ke li mem konfesis, ke li ordonis bruligi Romon, triaj, ke li grave malsaniĝis, aliaj fine, ke oni forportis lin, kvazaŭ mortintan, sur veturilo. Tie kaj ie aŭdiĝis voĉoj de kompato por la kristanoj: «Ne ili bruligis Romon, kial do tiom da sango, torturoj kaj maljusteco? Ĉu la dioj ne venĝos pro la senkulpuloj, kaj per kiaj *kulpoferoj* oni povos elpeti ilian pardonon?» La vortoj: «*innoxia corpora!*» ripetiĝadis ĉiam pli ofte. Virinoj laŭte kompatis la infanojn, kiujn tiel amase oni ĵetis al sovaĝaj bestoj, alnajlis al krucoj aŭ bruligis en ĉi tiuj malbenitaj ĝardenoj. Kaj fine la kompato sin ŝanĝis en insultojn kontraŭ la imperiestro kaj Tigeleno. Estis ankaŭ tiaj, kiuj, haltante subite, demandis sin mem aŭ aliajn: «Kiu estas tiu dio, kiu donas tian forton kontraŭ torturoj

kaj morto?» Kaj ili revenis hejmen pensemaj...

Ĥilono dume vagis ankoraŭ tra la ĝardenoj, ne sciante, kien iri kaj kien sin turni. Nun li eksentis sin denove senforta, kaduka kaj malsana maljunulo. Iafoje li falpuŝiĝadis pro netute brulintaj korpoj, puŝetadis bruletantajn ŝtipojn, kiuj sendadis post li amasojn da fajreroj, iafoje li sidiĝadis, rigardante ĉirkaŭen per senkonsciaj okuloj. La ĝardenoj iĝis jam preskaŭ tute mallumaj; inter la arboj sin movis nur la pala luno, per malforta brilo prilumante la aleojn, nigriĝintajn ŝtipojn, kuŝantajn transverse de ili, kaj brulrestaĵojn de la viktimoj, ŝanĝitajn en senformajn masojn. Sed al la maljuna greko ŝajnis, ke en la luno li vidas la vizaĝon de Glaŭko kaj ke liaj okuloj ankoraŭ rigardas lin senĉese, li do sin kaŝadis de la lumo. Fine li tamen eliris el la ombro kaj malgraŭvole, kvazaŭ puŝate de iu nekonata forto, komencis direkti sin al la fontano, apud kiu Glaŭko spiris sian lastan spiron.

Subite iu mano tuŝis lian ŝultron.

La maljunulo turniĝis kaj, vidante antaŭ si nekonatan figuron, ekkriis kun teruro:

- Kiu estas ĉi tie? Kiu ci estas?
- Apostolo, Paŭlo el Tarso.
- Mi estas malbenita!... Kion ci volas?

Kaj la apostolo respondis:

— Mi volas cin savi.

Ĥilono sin apogis sur arbo.

La piedoj ŝanceliĝis sub li kaj liaj brakoj ekpendis laŭlonge de la korpo.

— Por mi ne ekzistas savo! — li diris obtuze.

— Ĉu ci ne aŭdis, ke Dio pardonis al la pentanta fripono sur la kruco? — demandis Paŭlo.

— Ĉu ci scias, kion mi faris?

— Mi vidis cian suferon kaj mi aŭdis, kiel ci atestis pri la vero.

— Ho sinjoro!

— Kaj se la servanto de Kristo pardonis cin en sia horo de turmento kaj morto, kiel Kristo povus cin ne pardoni?

Ĥilono kaptis ambaŭmane la kapon, kvazaŭ freneza.

— Pardonu? Por mi pardonu?

— Nia Dio estas Dio de Kompatu, — respondis la apostolo.

— Por mi!?! — ripetis Ĥilono.

Kaj li komencis ĝemi, kiel homo, al kiu ekmankis fortoj por regi la doloron kaj suferon. Paŭlo diris:

— Apogu cin sur mi kaj sekvu min.

Kaj, preninte lin, li iris kun li al la kruciĝantaj stratoj, direktante sin per la voĉo de la fontano, kiu ŝajnis en la nokta silento priplori la korpojn de la martiroj.

— Nia Dio estas Dio de Kompato, — ripetis la apostolo. — Se ci stariĝus ĉe maro kaj ĵetadus en ĝin ŝtonojn, ĉu ci povus plenigi per ili la maran fundon? Kaj mi diras al ci, ke la kompato de Kristo estas kiel maro, kaj ke la pekoj kaj kulpoj de la homoj dronos en ĝi, kiel ŝtonoj en la profundaĵo. Kaj mi diras al ci, ke ĝi estas kiel la ĉielo, kiu kovras montojn, kontinentojn kaj valojn, ĉar ĝi estas ĉie kaj havas nek finon, nek limon. Ci suferis ĉe la paliso de Glaŭko kaj Kristo vidis cian suferon. Ci diris, ne konsiderante, kio povas cin morgaŭ trafi: «Tiu ĉi estas la brulmetinto!» kaj Kristo memoris ciajn vortojn. Ĉar pasis cia malboneco kaj mensogo, kaj en la koro restis nur senlima pento ... Venu kun mi kaj aŭskultu, kion mi diras al ci: jen ankaŭ mi malamis lin kaj persekutis liajn elektitojn. Mi lin ne volis kaj ne kredis, ĝis li aperis al mi kaj vokis min. De tiam li estas mia amato. Kaj nun sur cin li sendis aflikton, timon kaj doloron por voki cin al si. Ci lin malamis, sed li amis cin. Ci transdonis al torturoj liajn konfesantojn, sed li volas cin pardoni kaj savi.

La bruston de la mizerulo komencis skui grandega ploro, de kiu lia animo ŝiris sin ĝisfunde, kaj Paŭlo prenadis lin en posedon, ekregadis kaj kondukis, kiel soldato kondukas kaptiton.

Kaj post momento li rekomencis paroli:

— Sekvu min, kaj mi cin kondukos al li. Pro kiu alia kaŭzo mi estus veninta al ci? Sed li ordonis al mi rikolti la homajn animojn en la nomo de la amo, do mi plenumas lian servon. Ci opinias sin malbenita, sed mi diras al ci: ekkredu je li, kaj atendos cin savo. Ci pensas, ke ci estas malamata, sed mi ripetas al ci, ke li cin amas. Rigardu min! Kiam mi ne havis lin, mi havis nenion krom la malboneco, kiu loĝis en mia koro, kaj nun lia amo anstataŭas al mi la patron kaj la patrinon, riĉaĵojn kaj regadon. En li sola estas la rifuĝo. Li sola kalkulos cian penton, rigardos komplete cian mizeron, deprenos de ci la timon kaj levos cin al si.

Tiel parolante, li alkondukis lin al la fontano, kies arĝenta torento brilis de malproksime en la luna lumo. Ĉirkaŭe estis silento kaj malpleno, ĉar sklavoj-servistoj forigis jam de tie la karbiĝintajn palisojn kaj la korpojn de la martiroj.

Hilono ĵetis sin kun ĝemo sur la genuojn kaj, kaŝinte la vizaĝon en la manoj, restis senmove; Paŭlo levis dume la vizaĝon al la steloj kaj komencis preĝi:

— Sinjoro, rigardu ĉi tiun mizerulon, lian penton, liajn larmojn kaj suferojn! Sinjoro de Kompatato, kiu verŝis la propran sangon pro niaj kulpoj, je cia morto kaj leviĝo el mortintoj, pardonu lin!

Poste li eksilentis, sed longe rigardis ankoraŭ la stelojn kaj preĝis.

Kaj subite ĉe liaj piedoj aŭdiĝis voĉo, simila al ĝemo:

— Kristo!... Kristo!... pardonu min!

Tiam Paŭlo proksimiĝis al la fontano kaj, ĉerpinte akvon per la manoj, revenis al la genuanta mizerulo:

— Ĥilono! jen mi baptas cin en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Spirito! Amen!

Ĥilono levis la kapon, dismetis la manojn kaj restis tiel senmova. La luno plenbrile lumigis liajn blankiĝintajn harojn kaj same blankan, senmovan vizaĝon, kvazaŭ malvivan aŭ skulptitan el marmoro. Momentoj pasadis unu post alia; el grandegaj birdejoj, lokitaj en la ĝardeno de Domicia, komencis atingi ilin la kriado de kokoj, kaj li plu genuis, simila al surtomba statuo.

Fine li vekigis, levigis, kaj, turninte sin al la apostolo, demandis:

— Kion mi faru antaŭ la morto, sinjoro?

Ankaŭ Paŭlo vekigis el sia meditado pri tiu senlima potenco, kiun ne povis kontraŭstari eĉ tiaj spiritoj, kiel tiu de ĉi tiu greko, kaj li respondis:

— Fidu, kaj atestu pri la vero!

Poste ili kune eliris. Ĉe la ĝardena pordego la apostolo ankoraŭfoje benis la maljunulon kaj ili disiĝis, ĉar ĉi

tion postulis Ĥilono mem, antaŭvidante, ke post tio, kio okazis, Nerono kaj Tigeleno ordonos lin persekuti.

Li ne eraris, efektive. Reveninte hejmen, li trovis la domon jam ĉirkaŭita de pretorianoj, kiuj lin kaptis kaj komandate de Sceveno kondukis sur Palatinon.

Nerono estis jam irinta dormi, sed Tigeleno atendis, kaj ekvidinte la malfeliĉan grekon, akceptis lin kun vizaĝo trankvila, sed malbonaŭgura.

— Ci plenumis la krimon de ofendo de la majesto, — li diris al Ĥilono, — kaj ci ne evitos punon. Sed se morgaŭ ci deklaras en la amfiteatro, ke ci estis ebria kaj senkonscia kaj ke Romon bruligis la kristanoj, cia puno limiĝos al bastonado kaj ekzilo.

— Mi ne povas, sinjoro! — respondis Ĥilono mallaŭte.

Tiam Tigeleno proksimiĝis al li per malrapidaj paŝoj kaj per voĉo same mallaŭta, sed terura, demandis:

— Kiel do, ci ne povas, greka hundo? Ĉu ci ne estis ebria kaj ĉu ci ne komprenas, kio cin atendas? Rigardu tien!

Kaj dirinte ĉi tiujn vortojn, li montris en la angulon de la atrio, kie apud longa ligna benko staris en ombro kvar senmovaj sklavoĵoj el Tracio kun ŝnuroj kaj pinĉilegoj en la manoj.

Sed Ĥilono respondis:



— Mi ne povas, sinjoro!

Tigelenon komencis kapti furiozo, sed li ankoraŭ sin retenis.

— Ĉu ci vidis, — demandis li, — kiel mortas la kristanoj? Ĉu ci volas same morti?

La maljunulo levis supren sian palan vizaĝon; dum kelka tempo liaj lipoj movis sin mallaŭte, poste li respondis:

— Ankaŭ mi kredas je Kristo!...

Tigeleno rigardis lin kun mirego:

— Hundo, ci vere freneziĝis!

Kaj subite la furiozo, amasigita en lia brusto, rompis la digon. Saltinte al Ĥilono, li kaptis lin ambaŭmane je la barbo, faligis teren kaj komencis lin piedpremi, ripetante kun ŝaŭmo sur la buŝo:

— Ci malkonfesos! Ci malkonfesos!

— Mi ne povas! — respondis Ĥilono de sur la tero.

— Torturu lin!

Ekaŭdinte tiun ordonon, la tracoj kaptis la maljunulon kaj metis lin sur la benkon, poste, alfiksinte lin al ĝi per la ŝnuroj, komencis premi per la pinĉilegoj liajn malgrasajn krurojn. Sed li, dum oni lin alligadis, kisis humile iliajn manojn, poste fermis la okulojn kaj ŝajnis kvazaŭ mortinta.

Li vivis tamen, ĉar kiam Tigeleno kliniĝis super li kaj refoje demandis: «Ĉu ci malkonfesos?» la blankaj lipoj de Ĥilono moviĝis facile kaj eliĝis el ili apenaŭ aŭdebla flustro:

— Mi ... ne ... povas!...

Tigeleno ordonis ĉesigi la torturadon kaj komencis paŝi tra la atrio kun vizaĝo ŝanĝita de kolero, sed kune senhelpa. Fine en lian kapon venis videble iu nova penso, ĉar li sin turnis al la tracoj kaj diris:

— Elŝiru lian langon!

## Ĉapitro 63<sup>a</sup>

La dramon «*Aŭreolus*»<sup>323</sup> oni prezentadis ordinare en teatroj aŭ amfiteatroj tiel aranĝitaj, ke ili povis malfermiĝi kaj formi kvazaŭ du apartajn scenejojn. Sed post la spektaklo en la imperiestraj ĝardenoj oni forlasis la ordinaran manieron, ĉar oni deziris, ke kiel eble plej granda amaso da homoj povu rigardi la morton de krucumita sklavo, formanĝata en la dramo de urso. En la teatroj la rolon de la urso ludadis aktoro, ĉirkaŭkudrita per ursa fe-

---

<sup>323</sup> Supozeble temas pri la verko «*Laŭreolus*» de iu Katulo (samnomulo de la fama poeto), en kiu la rabisto Laŭreolo (el la tempo de imperiestro Kaligulo) iĝas krucumita kaj lasita al la formanĝo per sovaĝaj bestoj. La imperiestro Domiciano foje ekzekutigis kondamnitan krimulon, lasante lin reale plenumi la rolon de Laŭreolo (kiel en la ĉi-suba epizodo).

lo, sed ĉi-foje la spektaklo devis esti «vera». Ĝi estis nova ideo de Tigeleno. Nerono anoncis unue, ke li ne venos, sed laŭ persvado de la favorato li ŝanĝis la decidon. Tigeleno klarigis al li, ke post tio, kio okazis en la ĝardenoj, tiom pli li devas montri sin al la popolo, kaj kune li garantiis, ke la krucumita sklavo ne insultos lin, kiel faris Krispo. La popolo estis jam iom trosata kaj laca de la sango-verŝado, oni do anoncis al ĝi novan disdonadon de loteriaj biletoj kaj donacoj, kaj kune vesperan festenon, ĉar la spektaklo devis okazi vespere, en brilege lumigita amfiteatro.

Je la krepusko efektive la tuta konstruaĵo superpleniĝis; la aŭgustanoj kun Tigeleno fronte de ili venis ĉiuj senescepte, ne tiom pro la spektaklo mem, kiom por montri al Nerono post la lasta incidento sian fidelecon kaj por babili pri Ĥilono, pri kiu parolis la tuta Romo.

Oni do flustris al si reciproke en la orelojn, ke Nerono, reveninte el la ĝardeno, furioziĝis kaj ne povis endormiĝi, ke atakis lin fantomoj kaj strangaj vizioj, pro kiuj en la sekvinta tago li anoncis sian baldaŭan vojaĝon en Aĥajon. Aliaj tamen neis tion, asertante, ke nun li montriĝos tiom pli senindulga por la kristanoj. Ne mankis tamen ankaŭ timuloj, kiuj antaŭvidis, ke la akuzo, kiun Ĥilono ĵetis en la vizaĝon de Nerono antaŭ la amaso, povas havi plej

malbonajn sekvojn. Estis fine ankaŭ tiaj, kiuj en la nomo de humaneco petis Tigelenon, ke li ĉesigu pluan persekutadon.

— Rigardu, kien vi iras, — diris Barko Sorano. — Vi volis kontentigi la venĝon de la popolo kaj inspiri al ĝi la konvinkon, ke la puno atingis la kulpulojn, dume la efiko estas tute kontraŭa.

— Vere! — aldonis Antistio Vero, — ĉiuj flustras nun, ke ili estas senkulpaj. Se ĉi tion vi nomas lerteco, tiam Ĥilono pravis, dirante ke viaj cerboj ne plenigus la pladeton de glanŝelo.

Sed Tigeleno sin turnis al ili kaj diris:

— Oni flustras ankaŭ, Barko Sorano, ke cia edzino, Servilia, kaj cia edzino, Antistio, kaŝis siajn sklavojn kristanojn antaŭ la justeco de la imperiestro.

— Malvere! — ekkriis maltrankvile Barko.

— Mian edzinon volas pereigi viaj eksedzinoj, kiuj ĵaluzas ŝian virton! — diris same maltrankvile Antistio Vero.

Sed aliaj parolis pri Ĥilono.

— Kio okazis al li? — diris Eprio Marcelo. — Li mem transdonis ilin en la manojn de Tigeleno; el mizerulo li iĝis riĉulo, povis trankvile vivi la reston de siaj tagoj, havi belan enterigon kaj monumenton; tamen, ne! Subite li ek-

preferis ĉion perdi kaj pereigi sin; vere, li ja freneziĝis!

— Li ne freneziĝis, li iĝis kristano, — diris Tigeleno.

— Nekredeble! — ekkriis Vitelio.

— Ĉu mi ne diradis al vi! — intermetis Vesteno. —

«Murdu la kristanojn laŭplaĉe, sed, kreu al mi, ne militu kontraŭ ilia dio. Tio ne estas ŝerca afero!...» Rigardu, kio okazas! Mi ja ne bruligis Romon, sed se la imperiestro al mi permesus, mi tuj oferus hekatombon al ilia dio. Kaj ĉiuj devus fari la samon, ĉar mi ripetas, ne ŝercu kun tiu dio! Memoru, ke mi diris al vi ĉi tion.

— Kaj mi diris ion alian, — ekparolis Petronio. — Tigeleno ridis, kiam mi asertis, ke ili sin defendas, sed nun mi diros pli: ke ili konkeras!

— Kiel do? Kiel? — demandis kelkaj voĉoj.

— Je Polukso!... Ĉar se tia Ĥilono ne kontraŭstaris ilin, kiu ilin kontraŭstaros? Se vi pensas, ke post ĉiu spektaklo la kristanoj ne multiĝas, tiam kun via kono de Romo iĝu kaldronistoj aŭ komencu razi barbojn, ĉar tiam vi scios pli bone, kion la popolo pensas kaj kio okazas en la urbo.

— Li diras puran veron, je la sankta peplo de Diano! — ekkriis Vesteno.

Sed Barko sin turnis al Petronio.

— Kion ci volas esprimi?

— Mi finas per tio, per kio vi komencis: sufiĉe jam da

sango!

Kaj Tigeleno rigardis lin moke kaj diris:

— Nu, ankoraŭ iomete!

— Se cia kapo ne sufiĉas al ci, ci havas alian, la globet  
on de cia bastono! — respondis Petronio.

La pluan interparolon rompis la alveno de Nerono, kiu okupis sian lokon, akompanate de Pitagoro. Tuj poste komenciĝis la prezentado de «*Aŭreolus*», kiun oni ne multe atentis, ĉar la pensoj estis okupitaj per Ĥilono. Ankaŭ la popolo, kutimiĝinta al turmentoj kaj sango, enuis, sibilis, eligadis ekkriojn, malflatajn por la kortego, kaj postulis rapidigon de la sceno kun urso, kiu sola ekscitis ĝian intereson. Se oni ne esperus vidi la kondamniton maljunulon kaj ne atendus la donacojn, la sola spektaklo ne kapabla reteni la amasojn.

Sed fine venis la atendita momento. Cirkaj servistoj enportis unue lignan krucon, sufiĉe malaltan, por ke la urso, leviĝinte sur la postajn piedojn, povu atingi la bruston de la martiro, kaj poste du homoj enkondukis, aŭ pli ĝuste entrenis Ĥilonon, ĉar, havante la krurostojn rompitaĵoj, li ne povis mem iri. Oni metis lin kaj alnajlis al la ligno tiel rapide, ke la interesitaj aŭgustanoj ne povis eĉ bone lin rigardi, kaj nur kiam oni fiksis la krucon en la speciale preparita kavo, ĉies okuloj direktiĝis al li.

Tamen apenaŭ oni povis rekoni en ĉi tiu nuda maljunulo la antaŭan Hilonon. Post la torturoj, kiujn suferigis al li Tigeleno, ne restis en lia vizaĝo eĉ guto da sango, kaj nur sur la blanka barbo oni vidis ruĝan postsignon, kiun lasis la sango post la elŝiro de la lango. Tra la diafana haŭto oni povis preskaŭ vidi liajn ostojn. Li ankaŭ ŝajnis multe pli aĝa, preskaŭ kaduka. Sed aliflanke liaj okuloj antaŭe ĵetadis ĉiam rigardojn plenajn je maltrankvilo kaj malico, liaj viglaj trajtoj spegulis antaŭe ĉiaman timon kaj malcertecon — kaj nun li havis vizaĝon dolorplenan, sed tiel feliĉan kaj serenan, kian havas homoj dormantaj aŭ mortintaj. Eble lian fidon subtenadis la memoro pri la krucumita fripono, kiun Kristo pardonis, kaj eble li parolis interne al la kompatema Dio: «Sinjoro, mi mordadis, kiel venena vermo, sed mi ja estis dum la tuta vivo mizerulo, mi suferadis malsaton, homoj piedpremis min, batis kaj persekutis. Mi estis, ho Sinjoro, malriĉa kaj tre malfeliĉa, kaj nun oni transdonis min al torturistoj kaj najlis al kruco, do ci, ho Kompatema, ne forpuŝos min en la horo de mia morto!» Kaj paco venis videble en lian pentantan koron. Neniu ridis, ĉar en tiu krucumito estis io tiel trankvila, li ŝajnis tiel maljuna, sendefenda, malforta, tiel vokanta kompaton per sia humileco, ke malgraŭvole ĉiu demandis sin mem: kiel oni povas torturi kaj najli al kruco

homojn, kiuj jam estas sen tio mortantaj? La amaso silentis. Inter la aŭgustanoj Vesteno, klinante sin dekstren kaj maldekstren, flustris per terurita voĉo: «Rigardu, kiel ili mortas!» Aliaj atendis la urson, dezirante en la animo, ke la spektaklo finiĝu plej baldaŭ.

La urso enrampis fine la arenon kaj, ambaŭflanken balancante sian malalten klinitan kapon, ĝi rigardis ĉirkaŭen deflanke, kvazaŭ ĝi pri io meditus aŭ ion serĉus. Ekvidinte fine la krucon, kaj sur ĝi la nudan korpon, ĝi alproksimiĝis, levis sin, sed post momento ĝi ree malleviĝis sur la antaŭajn piedojn, kaj sidiĝinte apud la kruco, komencis murmuri, kvazaŭ eĉ en ĝia besta koro vekiĝus kompatato por tiu restaĵo de homo.

El la buŝo de la cirkaj servistoj aŭdiĝis instigaj krioj, sed la popolo silentis. Ĥilono denove per malrapida movo levis la kapon kaj dum kelka tempo kondukis la rigardon inter la publiko. Fine liaj okuloj haltis ie sur la plej altaj vicoj de la amfiteatro, kaj tiam okazis io, kio surprizis kaj mirigis la spektantojn. Jen lia vizaĝo eklumis de rideto, la frunton ekĉirkaŭis kvazaŭ radioj, la okuloj levis sin antaŭ la morto supren, kaj post momento du grandaj larmoj, ŝvelintaj sub la palpebroj, ekfluis malrapide sur lia vizaĝo.

Kaj li mortis.

Tiam laŭta vira voĉo eksonis de supre, el sub la vela-



rio:

— Pacon al la martiroj!

En la amfiteatro regis profunda silento.

## Ĉapitro 64<sup>a</sup>

Post la spektaklo en la imperiestraj ĝardenoj la malliberejoj multe malpleniĝis. Oni kaptadis ankoraŭ, vere, kaj malliberigadis personojn, suspektatajn pri la konfesado de la orienta superstiĉo, sed la ĉasoj provizadis ĉiam malpli multe da ili, apenaŭ tiom, kiom oni bezonis por plenigi la postajn spektaklojn, kiuj siavice estis jam venantaj al la fino. La popolo, tro sata de sango, elmontradis ĉiam pli grandan enuemon kaj ĉiam pli grandan maltrankvilon pro la ĝis nun senekzempla sinteno de la kondamnitaj. En la amasoj oni rakontis al si reciproke ĉiam pli strangajn aferojn pri venĝemo de la kristana dio. La mallibereja tifo, kiu disvastiĝis en la urbo, pligrandigis la ĝeneralan timon. Oni vidis oftajn enterigojn kaj ripetadis al si reciproke en la orelojn, ke necesas pluaj kulpoferoj por elpeti pardonon de la nekonata dio. En la temploj oni oferis al Jovo kaj Libitino. Fine, malgraŭ ĉiuj penoj de Tigeleno kaj liaj partianoj, ĉiam pli disvastiĝadis la opinio, ke la urbo estis bruligita laŭ la ordono de Nerono kaj ke la kristanoj suferas senkulpe.

Sed ĝuste tial same Nerono kiel Tigeleno daŭrigis senlace la persekutadon. Por trankviligi la popolon oni faris novajn disponojn pri la disdonado de greno, vino kaj oliveo; oni anoncis regulojn, faciligantajn la rekonstruadon de la domoj kaj plenajn je konsideroj por la posedantoj, kaj aliajn, koncernantajn la larĝecon de la stratoj kaj materialojn, el kiuj oni devas konstrui, por estonte eviti la katastrofon de brulo. Nerono mem partoprenadis la kunsidojn de la senato kaj interkonsilis kune kun la *patroj* pri la bono de la popolo kaj urbo, tamen eĉ ne ombro da favoro falis sur la kondamnitajn. La reganto de la mondo deziris antaŭ ĉio inspiri al la popolo la konvinkon, ke tiel senindulgaj punoj povas trafi nur kulpulojn. Ankaŭ en la senato neniu voĉo ekpledis pro la kristanoj, ĉar neniu volis riski malfavoron de la imperiestro, kaj krom tio la homoj, kies rigardo iris pli foren en la estontecon, asertis, ke eĉ disvastiĝo de la nova kredo la fundamento de la Roma regno ne povus resti sendetrua.

Oni redonadis al la familioj nur agoniantojn aŭ mortintojn, ĉar la Roma leĝo ne venĝis kontraŭ mortintoj. Por Vinicio certan konsolon prezentis la penso, ke se Ligia mortos, li enterigos ŝin en la familia tombaro kaj mem kuŝos apud ŝi. Li havis jam nenian esperon savi ŝin de la morto, kaj mem, duone foririnta de la vivo, dronanta en-

tute en Kristo, li ne revis plu pri alia kuniĝo ol la eterna. Lia kredo iĝis simple senfunda, tiel ke pro ĝi tiu eterneco ŝajnis al li io senkompare pli reala kaj pli vera ol la pasema ekzistado, per kiu li vivis ĝis nun. Lia koro plenpleniĝis per koncentrita ekstazo. Ankoraŭ viva li jam ŝanĝiĝadis en estaĵon preskaŭ senkorpan, kiu, sopirante plenan liberiĝon por si mem, deziris ĝin ankaŭ por la alia amata animo. Li imagis, ke tiam li kaj Ligia prenos sin reciproke je la manoj kaj foriros en la ĉielon, kie Kristo ilin benos kaj lasos ilin loĝi en lumo tiel trankvila kaj tiel grandega, kiel la ĉielbrilo. Li nur petegis Kriston, ke li ŝparu al Ligia la cirkan turmenton kaj lasu ŝin endormiĝi trankvile en la malliberejo, ĉar li sciis kun plena certeco, ke ankaŭ li mem mortos kun ŝi. Li pensis, ke kontraŭ ĉi tiu maro da elverŝita sango li ne rajtas esperi, ke ŝi sola estos savita. Li aŭdis de Petro kaj Paŭlo, ke ankaŭ ili devas morti martire. La vido de Ĥilono sur la kruco lin konvinkis, ke morto, eĉ martira, povas esti dolĉa, do li deziris jam, ke ĝi venu al ili ambaŭ, kiel la sopirata ŝanĝo de malbona, malgaja kaj malfeliĉa sorto en la pli bonan.

Iafoje li antaŭgustadis jam la transmondan vivon. Tiu malĝojo, kiu ŝvebis super ambaŭ iliaj animoj, perdadis ĉiam pli la iaman brulantan maldolĉecon kaj iom post iom ŝanĝadis sin en ian transmondan, trankvilan sinkonfidon

al la Dia volo. Antaŭe Vinicio penege naĝis kontraŭ la fluo, baraktis kaj suferis; nun li sin fordonis al la ondo, kredante ke ĝi lin portos en la eternan trankvilon. Li ankaŭ divenis, ke Ligia same kiel li sin preparas al la morto, ke malgraŭ la malliberejaj muregoj dividantaj ilin, ili jam iras kune, kaj al ĉi tiu penso li ridetis, kiel al feliĉo.

Kaj efektive ili iris tiel harmonie, kvazaŭ de longe ĉiutage ili estus dividantaj siajn pensojn. Ankaŭ en Ligia estis neniam deziroj kaj neniam espero, krom la transmonda vivo. La morto prezentis sin al ŝi ne nur kiel liberiĝo el la teruraj malliberejaj muregoj, el la manoj de Nerono kaj de Tigeleno, sed ankaŭ kiel la tempo de geedziĝo kun Vinicio. Kontraŭ ĉi tiu neskuebla certeco ĉio alia perdis la signifon. Post la morto devis komenciĝi por ŝi feliĉo eĉ tera, do ŝi atendis ĝin ankaŭ tiel, kiel fianĉino atendas la edziniĝan momenton.

Kaj ĉi tiu senlima torento da kredo, kiu forŝiradis de la vivo kaj portis trans la tombon milojn da unuaj konfesantoj, kaptis ankaŭ Urson. Ankaŭ li longe malvolis akcepti en la koro la morton de Ligia, sed kiam ĉiutage trans la malliberejajn muregojn penetradis la famoj pri tio, kio okazas en la amfiteatroj kaj ĝardenoj, kiam la morto ŝajnis komuna, neevitebla sorto de ĉiuj kristanoj kaj kune ilia feliĉo, supera ol ĉia mortema ideo pri feliĉo, ankaŭ li ne

kuraĝis fine preĝi al Kristo, ke li senigu Ligian de ĉi tiu feliĉo aŭ prokrastu ĝin por longaj jaroj. En sia simpla animo de barbaro li pensis krome, ke la filino de la ligia ĉefo havas pli grandajn rajtojn kaj ricevos pli multe el la ĉiela ĝuoj ol la tuta amaso da simpluloj, al kiuj ankaŭ li mem apartenis, kaj ke en la eterna gloro ŝi sidos pli proksime al la Ŝafido ol aliaj. Li aŭdis, vere, ke antaŭ Dio la homoj estas egalaj, sed al la fundo de lia animo kroĉis sin tamen la konvinko, ke la filino de ĉefo, plie de la ĉefo de ĉiuj ligioj, estas iu alia ol iu ajn sklavino. Li esperis ankaŭ, ke Kristo permesos al li servi ŝin plue. Koncerne sin mem li havis nur unu kaŝitan deziron, nome, ke li povu morti tiel, kiel la Ŝafido, sur kruco. Sed ĝi ŝajnis al li feliĉo tiel granda, ke kvankam li sciis, ke oni krucumas en Romo eĉ plej grandajn krimulojn, li preskaŭ ne kuraĝis preĝi pri tia morto. Li supozis, ke certe oni igos lin pereji de la dentegoj de sovaĝaj bestoj, kaj ĉi tio prezentis lian internan zorgon. De la infaneco li vivis en nepenetreblaj arbaregoj, meze de senĉesaj ĉasoj, pro kiuj, dank' al sia superhoma forto, li famiĝis inter la ligioj ankoraŭ antaŭ ol li atingis la viran aĝon. La ĉasoj prezentis lian okupon tiel ŝatatan, ke poste, kiam li estis en Romo kaj devis ilin rezigni, li vizitadis bestojn kaj amfiteatrojn, por almenaŭ rigardi la bestojn al li konatajn kaj nekonatajn. Ilia vido vekadis en li ne-

venkeblan sopiron al batalo kaj mortigado, li timis do nun en la animo, ke se li ekstaros kontraŭ ili en la amfiteatro, ekposedos lin pensoj malpli indaj je kristano, kiu devas morti pie kaj pacience. Sed li konfidis sin eĉ en tio al Kristo, konsolante sin per aliaj, pli dolĉaj pensoj. Nome, aŭdinte, ke la Ŝafido proklamis militon kontraŭ la inferaj potencoj kaj malbonaj spiritoj, al kiuj la kristana kredo kalkulis ankaŭ ĉiujn idolanajn diojn, li pensis, ke en tiu milito li tamen tre utilos al la Ŝafido kaj povos servi lin pli bone ol aliaj, ĉar ankaŭ tio ne povis trovi lokon en lia kapo, ke lia animo povus ne esti pli forta ol la animoj de la aliaj martiroj. Cetere li preĝadis dum tutaj tagoj, faradis servojn al la malliberuloj, helpadis la gardistojn kaj konsoladis sian reĝidinon, kiu bedaŭris iafoje, ke en sia mallonga vivo ŝi ne povis plenumi tiom da bonaj faroj, kiom plenumis la fama Tabita<sup>324</sup>, pri kiu rakontis al ŝi Petro la apostolo. La gardistoj, kiujn eĉ en la malliberejo timigis la terura forto de tiu grandegulo, ĉar estis kontraŭ ĝi nek sufiĉaj ŝnuroj, nek kradoj, ekamis lin fine pro lia dolĉeco. Ofte, mirigitaj per lia sereneco, ili demandis lin pri ĝia kaŭzo, kaj li rakontis al ili kun tia neŝancebla kredo, kia vivo atendas lin post la morto, ke ili aŭskultis kun miro, vidante por la unua fojo, ke en la subteraĵojn, nepenetreb-

---

<sup>324</sup> Vd Agoj 9:36.

lajn por la suno, povas penetri feliĉo. Kaj kiam li inklinigadis ilin, ke ili ekkredu je la Ŝafido, en la kapojn de pluraj venis la penso, ke ilia laboro estas laboro de sklavoj kaj ilia vivo — vivo de mizeruloj, kaj pluraj enpenŝigadis pri sia malbonsorto, kies finon nur la morto devis prezenti.

Sed la morto inspiris al ili novan timon kaj nenion ili esperis de ĝi, dum tiu ligia grandegulo kaj tiu knabino, simila al floro, ĵetita sur la malliberejan pajlon, iris al ĝi kun ĝojo, kiel al la pordo de feliĉo.

## Ĉapitro 65<sup>a</sup>

Unu vesperon vizitis Petronion senatano Sceveno<sup>325</sup> kaj komencis kun li longan interparolon pri la malfacila tempo, en kiu ambaŭ vivis, kaj pri la imperiestro. Li parolis tiel malkaŝe, ke Petronio, kvankam estante en amikaj rilatoj kun li, komencis esti singardema. Li plendis, ke la mondo iras malrekte kaj freneze kaj ke ĉio tio kune devas finiĝi per ia katastrofo, pli terura eĉ ol la brulego de Romo. Li parolis, ke eĉ la aŭgustanoj estas malkontentaj, ke Fenio Rufo<sup>326</sup>, la dua prefekto de la pretorianoj, elport-

---

<sup>325</sup> *Flavius Scaevinus* — pretoriana tribunuso kaj kvestoro, ano de la Pizona konspiro. Laŭ Tacito (*Analoj*, 16:18), Petronion oni akuzis pri amikeco kun Sceveno.

<sup>326</sup> *Fænius Rufus* — kolego de Tigeleno, ano de la Pizona konspiro. Ekzekutita en 65 p.K.

as plej kontraŭvole la abomenan regadon de Tigeleno, kaj ke la pacienco de la tuta gento de Seneko estas elĉerpita pro la maniero, en kiu Nerono kondukas al sia maljuna majstro kaj al Lukano.

Fine li komencis mencii la malkontentecon de la popolo, kaj eĉ de la pretorianoj, kiujn en granda parto Fenio Rufo sciis favorigi al si.

— Kial ci diras al mi ĉi tion? — demandis lin Petronio.

— Pro zorgemo pri la imperiestro, — respondis Sceveno. Mi havas en la pretorio malproksiman parencon, kiu nomas sin Sceveno, same kiel mi, kaj pere de li mi scias, kio okazas en la tendaro ... La malkontenteco kreskas ankaŭ tie ... Vidu, ankaŭ Kaligulo estis freneza, kaj rigardu, kio okazis! Jen troviĝis Kasio Ĥereo ... Terura faro ĝi estis kaj sendube estas inter ni neniuj, kiu ĝin aprobus, tamen Ĥereo liberigis la mondon de monstro.

— Alivorte, — respondis Petronio, — ci parolas tiel. «Mi Ĥereon ne laŭdas, sed tio estis bonega homo kaj la dioj donu al ni pli multe da similaj.»

Sed Sceveno ŝanĝis la temon kaj komencis neatendite glori Pizonon. Li gloris lian genton, lian noblecon, lian sindonon al la edzino, kaj fine lian saĝecon, trankvilecon kaj strangan kapablon inklinigadi al si la homojn.

— La imperiestro estas senida, — li diris, — kaj ĉiuj vi-



das lian sukcedonton en Pizono. Kaj sendube ĉiuj helpus lin tutkore atingi la regadon. Amas lin Fenio Rufo, la gento de Aneoj estas al li plene sindonema. Plaŭcio Laterano<sup>327</sup> kaj Tulio Seneciono saltus pro li en fajron. Kaj same Natalo, kaj Subrio Flavo, kaj Sulpicio Aspero,<sup>328</sup> kaj Afranio Kvintiano, kaj eĉ Vesteno.

— La lasta ne multe utilos al Pizono, — respondis Petronio. — Vesteno timas la propran ombron.

— Vesteno timas la songojn kaj spiritojn, — respondis Sceveno, — sed li estas homo brava, kiun oni prave volas nomi konsulo. Kaj se en la animo li estas kontraŭ la persekutado de la kristanoj, ne malbonkalkulu al li ĉi tion, ĉar ankaŭ al ci gravas, ke tiuj frenezaĵoj ĉesu.

— Ne al mi, sed al Vinicio, — diris Petronio. — Pro Vinicio mi volus savi knabinon, sed mi ne povas, ĉar mi perdis la favoron de Ahenobarbo.

— Kiel do? Ĉu ci ne rimarkas, ke la imperiestro denove proksimiĝas al ci kaj komencas kun ci paroli? Kaj mi diros al ci, kial. Nome li planas denove iri Aĥajon, kie li

<sup>327</sup> *Plaŭtius Lateranus* — nevo de Aŭlo Plaŭcio (noto [48]).

<sup>328</sup> *Antonius Natalis* — Roma kavaliro, ano de la Pizona konspiro. Arestite inter la unuaj, li perfidis la ceterajn konspiranojn, pro kio ricevis pardonon. —

*Subrius Flavius* — pretoriana tribunuso, ano de la Pizona konspiro. Ekzekutita en 65 p.K. —

*Sulpicius Asper* — centuriestro de pretoriana kohorto. Ekzekutita en 65 p.K.

intencas kanti grekajn kantojn, de li mem komponitajn. Li flamas al tiu vojaĝo, sed kune tremas, pensante pri la mokemo de la grekoj. Li imagas, ke povas lin trafi aŭ plej granda triumfo, aŭ plej granda falo. Li bezonas bonan konsilon, kaj li scias, ke neniu kapablus al li konsili pli bone ol ci. Jen estas la kaŭzo, pro kiu ci reakiras la favoron.

— Lukano povus min anstataŭi.

— La Kuprobarba malamegas lin kaj verdiktis al li morton en la animo. Li serĉas nur pretekston, ĉar li ĉiam serĉas pretekstojn. Lukano komprenas, ke necesas rapidi.

— Je Kastoro! — diris Petronio. — Povas esti. Sed mi havus ankoraŭ unu rimedon por baldaŭ reakiri la favoron.

— Kian?

— Simple ripeti al la Kuprobarba tion, kion ci diris antaŭ momento.

— Mi nenion diris! — ekkriis Sceveno maltrankvile. Sed Petronio metis la brakon sur lian ŝultron.

— Ci nomis la imperiestron frenezulo, ci antaŭvidis la postvenon de Pizono kaj diris: «Lukano komprenas, ke necesas rapidi». Pri kio do ci volas rapidi, karulo?

Sceveno paliĝis, kaj dum momento ili rigardis sin reciproke en la okulojn.

— Ci ne ripetos!

— Je la koksoj de Kipridino! Kiel bone ci min konas! Efektive, mi ne ripetos. Mi nenion aŭdis, sed mi ankaŭ volas nenion aŭdi ... Ĉu ci komprenis? La vivo estas tro mallonga, ke valoru ion entrepreni. Mi nur petas cin, ke ci vizitu hodiaŭ Tigelenon kaj parolu kun li same longe, kiel kun mi, pri kio ci volas!

— Kial?

— Tial, ke, se iam Tigeleno diros al mi: «Sceveno estis ĉe ci», mi povu al li rediri: «La saman tagon li estis ankaŭ ĉe ci».

Sceveno, aŭdinte tion, rompis eburan bastonon, kiun li tenis en la mano kaj respondis:

— Malbona sorĉo trafu ĉi tiun bastonon... Mi estos hodiaŭ ĉe Tigeleno kaj poste en la festeno ĉe Nervo. Ja ankaŭ ci ĉeestos, ĉu? En ĉiu okazo, ĝis la revido postmorgaŭ en la amfiteatro, kie oni prezentos la reston de la kristanoj!... Ĝis la revido!

— Postmorgaŭ! — ripetis Petronio, restinte sola. — Ni ne havas do tempon por perdi. Ahenobarbo efektive bezonos min en Aĥajo, eble do li konsideros je mi.

Kaj li decidis provi lastan rimedon.

Efektive dum la festeno ĉe Nervo la imperiestro mem ekpostulis, ke Petronio kuŝu kontraŭ li, ĉar li volis paroli

kun li pri Aĥajo kaj pri la urboj, kie li povus prezentiĝi kun la perspektivoj de plej granda sukceso. Plej multe gravis al li ĉi-momente la atenanaj, kiujn li timis. La aliaj aŭgustanoj aŭskultis ĉi tiun interparolon kun koncentrita atento, por, kaptinte fragmentetojn el la frazoj de Petronio, prezenti ilin poste kiel siajn.

— Ŝajnas al mi, ke mi ĝis nun ne vivis, — diris Nerono, — kaj ke mi naskiĝos nur en Grekujo.

— Ci naskiĝos al nova gloro kaj senmorteco, — respondis Petronio.

— Mi esperas, ke tiel okazos kaj ke Apolono ne montrigos ĵaluza. Se mi revenos triumfe, mi oferos al li hekatombon, kian ĝis nun havis neniu dio.

Sceveno komencis ripeti la versojn de Horacio:

*Sic te diva potens Cypri,  
sic fratres Helenæ, lucida sidera,  
ventorumque regat Pater ...*<sup>329</sup>

— La ŝipo atendas jam en Neapolo, — diris Nerono. — Mi volus ekiri eĉ morgaŭ.

Tiam Petronio levis sin kaj, rigardante rekte en la okulojn de Nerono, diris:

— Permesu, dia, ke mi antaŭe aranĝu edziĝan festen-

<sup>329</sup> Cin gvidu Kipridino; kaj steloj klaraj du, la fratoj de Helen'; kaj gvidu ankaŭ de l' ventoj patro (Horaco, *Odoj* 1:3).

on, al kiu mi invitos ankaŭ cin ĉiujn.

— Edziĝan festenon? Kies? — demandis Nerono.

— De Vinicio kun la filino de la ligia reĝo, cia garantiulino. Ŝi estas nun, vere, en malliberejo, sed unue, kiel garantiulino, ŝi ne povas esti malliberigata, kaj due, ci mem permesis al Vinicio je ŝi edziĝi; ĉar ciam verdiktoj, kiel la verdiktoj de Zeŭso, estas nerevokeblaj, tial ordonu ellasi ŝin el la malliberejo kaj transdoni ŝin al la fianĉo.

La malvarma sango kaj la trankvila memcerteco, kun kiu parolis Petronio, konfuzis Neronon, kiu ĉiam konfuziĝadis, kiam iu parolis al li en tia maniero.

— Mi scias, — li respondis, mallevente la okulojn. — Mi pensis pri ŝi kaj pri tiu grandegulo, kiu sufokis Krotonon.

— Sekve ambaŭ estas savitaj, — rediris Petronio.

Sed Tigeleno rapidis helpi sian sinjoron:

— Ŝi estas en la malliberejo laŭ la volo de Cezaro, kaj ci mem diris, Petronio, ke liaj verdiktoj estas nerevokeblaj.

Ĉiuj ĉeestantoj, konante la historion de Vinicio kaj Ligia, bonege sciis, pri kio temas, ili do eksilentis, scivolaj, kiel finiĝos la interparolo.

— Ŝi estas en la malliberejo pro cia eraro kaj pro cia nekono de la leĝo de nacioj, kontraŭ la volo de Cezaro, —

respondis akcente Petronio. — Ci estas, Tigeleno, naiva homo, sed ci ja ne asertos, ke ŝi bruligis Romon, ĉar cetero, eĉ se ci tion asertus, Cezaro ne ekkredus al ci.

Sed Nerono jam sin ekregis kaj komencis fermeti siajn miopajn okulojn kun la esprimo de nedirebla maliceco.

— Petronio pravas, — li diris post momento.

Tigeleno rigardis lin kun miro.

— Petronio pravas, — ripetis Nerono. — Morgaŭ oni malfermos al ŝi la pordegon de la malliberejo, kaj pri la edziĝa festeno ni parolos postmorgaŭ, en la amfiteatro.

«Mi malvenkis denove», ekpensis Petronio.

Kaj, reveninte hejmen, li estis jam tiel certa, ke venis la fino de la vivo de Ligia, ke sekvatage li sendis en la amfiteatron sian fidatan liberigiton, por ke ĉi tiu interkonsentu kun la estro de la kadavrejo pri la eldono de ŝia korpo, ĉar li volis transdoni ĝin al Vinicio.

## Ĉapitro 66<sup>a</sup>

Dum la tempo de Nerono tiel en la cirko, kiel en la amfiteatroj populariĝis vesperaj spektakloj, antaŭe maloftaj kaj aranĝataj nur en esceptaj okazoj. La aŭgustanoj ŝatis ilin, ĉar ofte sekvadis ilin festenoj kaj drinkadoj, daŭrantaj ĝis la mateno. Kvankam la popolo estis jam trosata de la sangoverŝado, tamen, kiam diskoniĝis la famo, ke venas la fino de la cirkoludoj kaj ke la lastaj kristanoj estas mortontaj en la vespera spektaklo, sennombraj amasoj plenigis la amfiteatron. La aŭgustanoj venis senescepte, ĉar ili konjektis, ke ĝi ne estos ordinara spektaklo kaj ke Nerono decidis aranĝi al si tragedion el la doloro de Vinicio. Tigeleno gardis sekreton pri la speco de torturo, destinita por la fianĉino de la juna tribunuso, sed ĉi tio ekscitis nur la ĝeneralan scivolon. Tiuj, kiuj iam vidis Ligian ĉe la Plaŭcioj, rakontis nun mirindaĵojn pri ŝia belegeco. Aliajn interesis antaŭ ĉio la demando, ĉu efektive ili vidos ŝin hodiaŭ sur la areno, ĉar multaj el tiuj, kiuj aŭdis la respondon, kiun Nerono donis al Petronio ĉe Nervo, komentis ĝin dusence. Kelkaj simple supozis, ke Nerono transdonos aŭ eble eĉ jam transdonis la knabinon al Vinicio: oni rememoris, ke ŝi estas garantiulino kaj rajtas, sekve de tio, adori tiujn diojn, kiuj plaĉas al ŝi, kaj ke la leĝo

de nacioj ne permesas ŝin puni.

La necerteco, atendado kaj scivolo ekregis ĉiujn spektantojn. Nerono alvenis pli frue ol ordinare, kaj kun lia alveno oni komencis denove flustri al si reciproke, ke tamen okazos certe io eksterordinara, ĉar, krom Tigeleno kaj Vatino, Nerono akompanis Kasio, centuriestro kun grandega staturo kaj grandega forto, kiun la imperiestro kunprenadis nur tiam, kiam li volis havi apude defendanton, ekzemple, kiam plaĉis al li fari noktajn ekskursojn en Suburon, kie li sin amuzis per la ludo, nomata *sagatio*, konsistanta en suprenĵetado de envoje renkontitaj knabinoj sur soldata mantelo. Oni rimarkis ankaŭ, ke en la amfiteatro mem estis entreprenitaj certaj gardorimedoj. Oni pligrandigis la pretorian gardon, kaj la komandon super ĝi havis ne centuriestro, sed tribunuso, Subrio Flavo, konata ĝis nun pro sia blinda sindono al Nerono. Oni ekkomprenis tiam, ke Nerono deziras por ĉia eventualo sendanĝerigi sin kontraŭ eksplodo de malespero flanke de Vinicio, kaj la scivolo kreskis ankoraŭ pli.

Ĉies rigardoj turnadis sin kun streĉita intereso al la loko, kie sidis la malfeliĉa fianĉo. Kaj li, tre pala, kun frunto kovrita de ŝvitgutoj, estis necerta, kiel la aliaj, sed maltrankvila ĝis la plejfundo de la animo. Petronio, ne sciante mem precize, kio okazos, diris al li nenion, li nur



demandis Vinicion, reveninte de Nervo, ĉu li estas preta al ĉio, kaj poste, ĉu li ĉeestos la spektaklon. Vinicio respondis al ambaŭ demandoj: «Jes!» sed ĉe tio ĉi malvarma tremo trakuris lian tutan korpon, ĉar li komprenis, ke Petronio demandis ne senkaŭze. Li mem vivis de kelka tempo kvazaŭ duonvive, li mem profundiĝis jam en la morton kaj akceptis la morton de Ligia, ĉar ĝi devis esti por ili ambaŭ kune liberiĝo kaj geedziĝo, sed nun li ekkonis, ke alia afero estas pensi de malproksime pri la lasta momento, kiel pri trankvila endormiĝo, kaj alia — iri rigardi torturon de persono pli kara ol la vivo. Ĉiuj antaŭe suferitaj doloroj vekiĝis en li denove. La kvietigita malespero komencis denove krei en lia animo; ekregis lin la antaŭa deziro savi Ligian je ĉia kosto. De la mateno li volis penetri en la tunelojn por certiĝi, ĉu Ligia troviĝas tie, sed pretoriaj gardoj postenis ĉe ĉiuj pordegoj kaj la ordonoj estis tiel severaj, ke la soldatoj, eĉ konantaj la junan tribunuson, lasis sin moligi nek per peto, nek per oro. Al Vinicio ŝajnis, ke la necerteco mortigos lin, antaŭ ol li ekvidos la spektaklon. Ie en la fundo de lia koro pulsetis ankoraŭ la espero, ke eble Ligia ne estas en la amfiteatro kaj ke ĉiuj timoj estas vanaj. En momentoj li kroĉis sin al tiu penso per ĉiuj fortoj. Li parolis al si, ke Kristo ja povis preni ŝin el la malliberejo, sed li ne povis permesi ŝian turmenton

en la cirko. Antaŭe li akceptis jam en ĉio lian volon; nun, kiam, forpuŝite de la pordoj de la tuneloj, li revenis sian lokon en la amfiteatro kaj kiam el scivolaj rigardoj al li direktataj, li ekkonis, ke plej teruraj supozoj povas esti pravaĵoj, li komencis en la animo petegi Kriston pri savo, kun pasio simila al minaco. «Ci povas!» li ripetadis, konvulsie kunpremante la manojn, «Ci povas!»

Antaŭe li eĉ ne supozis, ke tiu momento, kiam ĝi iĝos reala, estos tiel terura. Nun, ne konsciante, kio al li okazas, li antaŭsentis tamen, ke se li vidos la turmenton de Ligia, tiam lia tuta amo ŝanĝos sin en malamon, kaj la kredo en lia koro — en malesperon. Kaj kune teruris lin tiu sento, ĉar li timis ofendi Kriston, kiun li petegis pri kompatado kaj miraklo. Li ne petis jam pri ŝia vivo, li deziris nur, ke ŝi mortu antaŭ ol oni ŝin kondukos sur la arenon, kaj el la senfunda abismo de doloro li ripetadis en la animo: «Almenaŭ ĉi tion al mi ne rifuzu, kaj mi amos cin ankoraŭ pli ol ĝis nun mi cin amis!»

Fine liaj pensoj elkateniĝis, kiel ondoj, kirlataj de ventego. Vekiĝadis en li avido je venĝo kaj sango. Ekkaptadis lin furioza deziro ĵeti sin sur Neronon kaj sufoki lin antaŭ ĉiuj spektantoj, kaj kune li sentis, ke per tiu pasio li denove ofendas Kriston kaj malrespektas liajn ordonojn. En momentoj trafulmadis lian kapon la espero, ke ĉion tion,

antaŭ kio tremis lia animo, fortunus eble ankoraŭ la ĉiopova kaj kompatema mano, sed tiuj fulmoj tuj estingiĝadis, kvazaŭ en senlima senreviĝo pro tio, ke Tiu, kiu povis per unu vorto detrui ĉi tiun cirkon kaj savi Ligian, forlasis ŝin tamen, kvankam ŝi fidis kaj amis lin per ĉiuj fortoj de sia pura koro. Kaj li pensis plue, ke ŝi kuŝas tie en la malluma tunelo, malforta, sendefenda, forlasita, donita al plaĉo aŭ malplaĉo de brutsimilaj gardistoj, dum li devas atendi senhelpe en ĉi tiu terura amfiteatro, ne sciante, kian turmenton oni elpensis por ŝi kaj kion li vidos post momento. Fine, kiel homo falanta en abismon kaptas ĉion, kio kreskas ĉe ĝia rando, tiel ankaŭ li kaptis ambaŭmane la penson, ke tamen nur per la kredo li povas ŝin savi. Restis ja nur tiu sola rimedo! Petro ja diris, ke per la kredo oni povas movi la fundamentojn de la tero!

Do li koncentriĝis, subpremis en si la dubon, fermis sian tutan estaĵon en du vortojn: «Mi kredas!» — kaj atendis miraklon.

Sed kiel trostreĉita kordo devas krevi, tiel ankaŭ lin rompis la streĉo. Kadavra paleco kovris lian vizaĝon kaj la korpo komencis rigidiĝi. Tiam li ekpensis, ke lia preĝo estas aŭdita, ĉar jen li mortas. Ekŝajnis al li, ke ankaŭ Ligia sendube estas jam mortinta kaj ke Kristo tiamaniere prenas ilin al si. La areno, la blankaj togoj de la sennom-

braj spektantoj, la lumo de milo da lampoj kaj torĉoj, ĉio kune malaperis de lia vido.

Sed tiu senforteco ne daŭris longe. Post momento li vekigis, aŭ pli ĝuste vekis lin la piedfrapado de la malpacientanta popolo.

— Ci estas malsana, — diris al li Petronio, — ordonu reporti cin hejmen.

Kaj ne atentante, kion diros al ĉi tio la imperiestro, li leviĝis por subteni Vinicion kaj eliri kune kun li. Lia koro ŝvelis de kompatado, kaj krome incitis lin neelporiteble tio, ke Nerono rigardis tra la smeraldo Vinicion, studante kun kontenteco lian doloron, eble por poste priskribi ĝin en patosaj strofoj kaj gajni aplaŭdojn de aŭskultantoj.

Vinicio ekskuis la kapon. Li povis morti en ĉi tiu amfiteatro, sed li ne povis el ĝi eliri. La spektaklo estis ja komencota en plej proksimaj minutoj.

Efektive preskaŭ en la sama momento la urboprefekto ĵetis antaŭ sin ruĝan tukon, kaj je ĉi tiu signo ekknaris la rigliloj kontraŭ la imperiestra podio, kaj el la nigra faŭko sur la hele lumigitan arenon eliris Urso.

La grandegulo palpebrumis, videble blindigita de la lumo reganta sur la areno, poste li elŝovis sin sur ĝian mezon, rigardante ĉirkaŭen, kvazaŭ li volus ekkoni, kontraŭ kio li devos batali. Ĉiuj aŭgustanoj kaj pliparto de la

spektantoj sciis, ke tio estas la homo, kiu sufokis Krotonon, tial je lia vido murmuro aŭdiĝis en ĉiuj vicoj. En Romo ne mankis gladiatoroj, multege superantaj la ordinaran homan kreskon, sed iun similan ankoraŭ ne vidis la okuloj de la *kviritoj*. Kasio, staranta en la podio post Nerono, ŝajnis kontraŭ tiu ligio homo senaspekta. La senatanoj, la vestaloj, Nerono, la aŭgustanoj kaj la popolo rigardis kun ravo de kompetentuloj kaj cirkamantoj liajn potencajn femurojn dikajn, kiel branĉoj, la bruston similan al du kunigitaj ŝildoj, kaj la herkulajn brakojn. La murmuro kreskis kun ĉiu momento. Por tiuj amasoj ne povis ekzisti plezuro pli granda ol vidi tiajn muskolojn en movo, en streĉo kaj en batalo. La murmuro ŝanĝadis sin en ek-kriojn kaj en ekscititajn demandojn, kie loĝas la gento, en kiu naskiĝas similaj grandeguloj, kaj li staris en la mezo de la amfiteatro, nuda, pli simila al ŝtona koloso ol al homo, kun koncentrita kaj malgaja vizaĝo de barbaro, kaj, vidante la malplenan arenon, rigardis kun miro per siaj bluaj, infanaj okuloj jen la publikon, jen la imperiestron, jen la kradojn de la tuneloj, el kie li atendis torturistojn.

En la momento, kiam li estis eniranta la arenon, en lia koro de simplulo lastfoje ekpulis la espero, ke eble atendas lin kruco, sed, kiam li ekvidis nek krucon, nek pretan kavon, li ekpensis, ke li ne indas tian favoron kaj ke li

devos morti alie, certe de sovaĝaj bestoj. Li estis senarma kaj decidis pere, kiel decas al konfesanto de la Ŝafido, trankvile kaj pacience. Dume li volis preĝi ankoraŭ al la Savinto, do, genuiĝinte sur la areno, li kunmetis la manojn kaj levis la rigardon al la steloj, flagrantaj tra la supra malfermaĵo de la cirko.

Ĉi tiu sinteno malplaĉis al la amaso. Oni jam havis sufiĉe da kristanoj, mortantaj kiel ŝafoj. Oni komprenis, ke se la grandegulo ne volos sin defendi, la spektaklo malsukcesos. Tie kaj ie aŭdiĝis eksibloj. Kelkaj komencis voki pri la *mastigoforoj*, kies tasko estis vipi luktistojn ne volantajn batali. Post momento tamen ĉiuj eksilentis, ĉar neniu sciis, kio atendas la grandegulon kaj ĉu li ja volos batali, kiam li renkontos la morton, okulo kontraŭ okulo.

Oni ne atendis longe. Subite aŭdiĝis la akra sono de la trumpetoj, kaj je ĉi tiu signo malfermiĝis la krado kontraŭ la imperiestra podio kaj sur la arenon enkuris, meze de krioj de bestistoj, grandega ĝermana uro, portanta sur la kapo nudan virinan korpon.

— Ligia! Ligia! — ekkriis Vinicio.

Poste li kaptis ambaŭmane la harojn sur la tempioj, kuntordiĝis, kiel homo, kiu eksentis en si la pinton de lanco, kaj per raŭka, nehoma voĉo komencis ripeti:

— Mi kredas! Mi kredas!... Kristo! Miraklon!!

Kaj li eĉ ne sentis, ke en ĉi tiu momento Petronio kovris lian kapon per la togo. Ŝajnis al li, ke morto aŭ doloro vualis liajn okulojn. Li ne rigardis, li ne vidis. Ekregis lin sento de terura malpleno. En lia kapo restis eĉ ne unu penso, nur la buŝo ripetadis, kvazaŭ freneze:

— Mi kredas! Mi kredas! Mi kredas!

Subite la amfiteatro eksilentis. La aŭgustanoj leviĝis de siaj lokoj, kiel unu homo, ĉar sur la areno okazis io eksterordinara. La ligio, antaŭ momento humila kaj preta al morto, ekvidinte nun sian reĝidinon sur la kornoj de la sovaĝa besto, saltleviĝis kvazaŭ brulvundita per fajro, kaj, klininte la nukon, komencis kuri transverse al la furioza besto.

El ĉiuj brustoj elŝiris sin mallonga ekkrio de miro, kiun sekvis profunda silento; la ligio dume alkuris en unu momento la furiozan uron kaj kaptis ĝin je la kornoj.

— Rigardu! — ekkriis Petronio, deŝirante la togon de la kapo de Vinicio.

Kaj ĉi tiu leviĝis, klinis malantaŭen sian tolpalan vizaĝon, kaj komencis rigardi la arenon per vitrosimilaj, senkonsciaj okuloj.

Ĉiuj brustoj ĉesis spiri. En la amfiteatro oni povis aŭdi traflugantan muŝon. La homoj ne volis kredi al siaj okuloj. Kiel longe Romo ekzistis, oni vidis nenion similan.

La ligio tenis la sovaĝan beston je la kornoj. Liaj piedoj eniĝis ĝis super la maleoloj en la sablon, la dorso kurbiĝis, kiel streĉita pafarko, la kapo kaŝiĝis inter la ŝultr-ojn, la muskoloj de la brakoj tiel ŝvelis, ke la haŭto preskaŭ krevis sub ilia premo, sed li haltigis la uron loke. La homo kaj la besto iĝis tiel senmovaj, ke al la spektantoj ŝajnis, kvazaŭ ili vidas bildon, prezentantan agon de Herkulo aŭ Tezeo, aŭ grupon skulptitan el ŝtono.

Sed en tiu ŝajna trankvilo oni sentis teruran streĉon de la du fortegoj. La uro, same kiel la homo, enigis la piedojn en la sablon, kaj ĝia malhela, vila korpo kuntiriĝis tiel, ke ĝi ŝajnis simila al grandega bulo. Kiu elĉerpiĝos unua, kiu falos unua, jen estis la demando, kiu por tiuj spektantoj, amegantaj la cirkajn batalojn, signifis ĉi-momente pli ol ilia propra sorto, ol la tuta Romo kaj ĝia mondoregado. Tiu ligio estis nun por ili duondio, inda je adoro kaj statuoj. Eĉ la imperiestro mem leviĝis. Li kaj Tigeleno, aŭdinte pri la fortego de la homo, speciale aranĝis tiun spektaklon kaj moke diris al si: «Venku tiu Krotonmortiginto la uron, kiun ni por li elektos»; nun kun mirego ili rigardis la bildon, kiun ili havis antaŭ si, kvazaŭ ne kredante ĝin reala.

En la amfiteatro iuj homoj, levinte la manojn, restis tiel. Al aliaj ŝvito surverŝis la frunton, kvazaŭ ili mem ba-



talus kontraŭ la besto. En la cirko oni aŭdis nur la sibladon de la flamoj en la lampoj kaj la bruetadon de karboj, defalantaj de la torĉoj. La voĉoj morthaltis en la buŝoj de la spektantoj, nur la koroj bategis en la brustoj, kvazaŭ volante ilin krevigi. Ŝajnis al ĉiuj, ke la batalo daŭras jarcentojn.

Dume la homo kaj la besto staris ĉiam en terura streĉo, oni dirus, fiksitaj en la teron.

Subite el la areno aŭdigis obtuza, ĝemsimila muĝo, post kiu el ĉiuj brustoj elŝiris sin ekkrio, kaj denove ekregis silento. La homoj ekpensis, ke ili sonĝas: la monstra kapego de la uro komencis turniĝi en la feraj manoj de la barbaro.

Kaj la vizaĝo de la ligio, lia nuko kaj brakoj ruĝiĝis purpure, lia dorso kurbiĝis ankoraŭ pli. Oni vidis, ke li streĉas la reston de siaj superhomaj fortoj, sed ke ili sufiĉos al li jam por nelonge.

Ĉiam pli obtuza, pli raŭka kaj ĉiam pli dolora muĝado de la uro sin miksis kun fajfa spirado de la brusto de la grandegulo. La kapego de la besto estis turnata ĉiam pli, kaj el la faŭko elŝoviĝis longa, ŝaŭmkovrita lango.

Unu momento ankoraŭ — kaj la orelojn de la pli proksimaj spektantoj atingis kvazaŭ krako de ostoj, post kio la besto falegis teren kun mortrompita nuko.

Tiam la grandegulo deŝovis en unu momento la ŝnur-ojn de ĝiaj kornoj kaj, preninte la knabinon sur la brak-ojn, komencis spiri rapide.

Lia vizaĝo paliĝis, la haroj kungluiĝis de ŝvito, la ŝul-troj kaj la brakoj ŝajnis surverŝitaj per akvo. Dum mo-mento li staris tiel kvazaŭ duone konscia, poste tamen li levis la okulojn kaj komencis rigardi la publikon.

Kaj la amfiteatro ekfrenezis.

La muroj de la konstruaĵo komencis tremi pro krieg-ado de kelkdek mil spektantoj. De la komenco de la spek-takloj oni ne vidis tian ekscitegon. La homoj, sidantaj en la pli altaj vicoj, forlasis ilin kaj komencis paŝi malsupren, interpretante sin en la interbenkoj por rigardi pli proksi-me la fortegulon. De ĉie aŭdiĝis vokoj pri kompato, vokoj pasiaj, obstinaj, kiuj baldaŭ ŝanĝiĝis en unu ĝeneralan krion. Por la popolo, adoranta la fizikan forton, tiu grand-egulo iĝis nun kara kaj unua persono en Romo.

Kaj li komprenis, ke la popolo postulas, ke oni lasu al li la vivon kaj redonu la liberecon, sed videble ne nur pri si mem li zorgis. Dum momento li rigardis ĉirkaŭen, poste li proksimiĝis al la imperiestra podio kaj, balancante sur la etenditaj brakoj la korpon de la knabino, levis la okul-ojn kun la esprimo de petego, kvazaŭ li volus diri:

«Ŝin kompatu! Ŝin savu! Por ŝi mi tion faris!»

La spektantoj komprenis bonege, kion li postulis.

Ĉe la vido de la sveninta knabino, kiu apud la grandega korpo de la ligio ŝajnis malgranda infano, kortuŝo ekregis la popolon, la kavalirojn kaj la senatanojn. Ŝia delikata figuro, tiel blanka, kvazaŭ skulptita el alabastro, ŝia sveno, la terura danĝero, el kiu savis ŝin la grandegulo, kaj fine ŝia beleco kaj lia amo ekskuis la korojn. Kelkaj pensis, ke tio estas patro, peteganta kompaton por sia infano. La kompatado eksplodis subite, kiel flamo. Sufiĉe jam oni havis da sango, sufiĉe da morto, sufiĉe da turmentoj. Larmopremitaj voĉoj komencis postuli pardonon por ili ambaŭ.

Urso dume antaŭeniĝadis laŭronde de la areno kaj, balancante ĉiam la knabinon sur la brakoj, per gesto kaj okuloj petegis por ŝi la vivon. Subite Vinicio leviĝis de sia loko, transsaltis la ĉirkaŭbaron, apartigantan la unuajn vicojn de la areno, kaj alkurinte al Ligia, kovris per la togo ŝian nudan korpon.

Poste li disŝiris la tunikon surbruste, malkovris la cikatrojn, kiuj restis al li post vundoj, ricevita en la armena milito, kaj etendis la brakojn al la popolo.

Tiam la ekscito de la spektantoj superis ĉian mezuron, viditan iam ajn en la amfiteatroj. La amasoj komencis piedfrapi kaj muĝi. La voĉoj, vokantaj pardonon, iĝis simple

minacaj.

La popolo propetis jam ne nur por la atleto, nun ĝi prenis en la defendon la knabinon, la soldaton kaj ilian amon. Miloĵ da spektantoj sin turnis al la imperiestro kun kolera brilo en la okuloj kaj kun manoj kunpremitaj.

Tiu tamen malrapidis kaj hezitis. Kontraŭ Vinicio li ne havis, vere, malamon, kaj la morto aŭ vivo de Ligia estis al li indiferentaj, sed li preferus vidi la korpon de la knabino disŝirita per la kornoj de la uro, aŭ disgratitan per la dentegoj de sovaĝaj bestoj. Same lia krueleco, kiel lia degenerinta fantazio kaj degenerintaj instinktoj trovis ian volupton en similaj bildoj. Kaj nun la popolo volis senigi lin de tiu volupto. Ĉe tiu ĉi penso kolero speguliĝis sur lia grasa vizaĝo. Ankaŭ la ambicio ne permesis al li subiĝi al la volo de la amaso, sed kune, pro la denaska timemo, li ne kuraĝis ĝin kontraŭstari.

Li komencis do rigardi, ĉu almenaŭ inter la aŭgustanoj li vidos subenturnitajn dikfingrojn, la signon de morto. Sed Petronio tenis la manon levita supren, rigardante ĉe tio preskaŭ provoke en lian vizaĝon. La superstiĉa, sed ekscitiĝema Vesteno, kiu timis la spiritojn, sed ne timis la homojn, donis la signon de pardono. Same faris la senatano Sceveno, same Nervo, same Tulio Seneciono, same la maljuna glora militestro, Ostorio Skapula, same Antistio,

same Pizono kaj Veto, kaj Krispeno, kaj Minucio Termo, kaj Poncio Telezeno, kaj la plej respektinda, adorata de la popolo, Trazeo. Je tiu vido Nerono mallevis la smeraldon de la okulo kun la esprimo de malestimo kaj ofendo, subite tamen Tigeleno, kiu deziris spiti Petronion, kliniĝis al li kaj diris:

— Ne cedu, dia, ni havas la pretorianojn.

Tiam Nerono sin turnis al la loko, kie la komandon super la pretorianoj havis la severa kaj ĝis nun al li tutanime fidela Subrio Flavo, kaj li ekvidis ion eksterordinaran. La vizaĝo de la maljuna tribunuso estis severa, sed surverŝita de larmoj, kaj li tenis la manon supren, signe de pardono.

Dume la amasojn komencis kapti furiozo. Polvo leviĝis de sub la frapantaj piedoj kaj vualis la amfiteatron. Meze de la ekkrioj aŭdiĝis la voĉoj: «Ahenobarbo! patrinmurdinto! Brulmetinto!»

Nerono ektimis. La popolo estis ĉiopova reganto en la cirko. La antaŭaj imperiestroj, precipe Kaligulo, kuraĝis iafoje kontraŭstari ĝian volon, kio cetere ĉiam kaŭzadis ribelojn, eĉ sangoverŝon.

Sed Nerono estis en alia situacio. Unue, kiel aktoro kaj kantisto li bezonis la favoron de la popolo, due, li volis havi ĝin pro si kontraŭ la senato kaj patricioj, kaj fine,

post la bruligo de Romo li penis ĉiel favorigi ĝin al si kaj direkti ĝian koleron kontraŭ la kristanojn. Li ekkomprenis fine, ke kontraŭstari pli longe estus simple danĝere. Ribelo, komencita en la cirko, povus ekregi la tutan urbon kaj kaŭzi neantaŭvideblajn konsekvencojn.

Li rigardis do ankoraŭ fojon al Subrio Flavio, al la centuriestro Sceveno, parenco de la senatano, al la soldatoj, kaj, vidante ĉie kuntiritajn brovojn, kortuŝitajn vizaĝojn kaj sur li fiksitajn okulojn, li donis la signon de pardono.

Tiam tondro da aplaŭdoj eksonis de supre ĝis malsupre. La popolo estis jam certa pri la vivo de la kondamnitaj, ĉar de ĉi tiu momento ili iĝis kvazaŭ ĝiaj zorgatoj, kaj eĉ Nerono ne kuraĝus persekuti ilin plu per sia venĝo.

## Ĉapitro 67<sup>a</sup>

Kvar bitinianoj gardeme portis Ligian al la domo de Petronio. Vinicio kaj Urso iris apude, rapidante, por transdoni ŝin plej baldaŭ en la manojn de greka kuracisto. Ili iris en silento, ĉar post la ĉi-tagaj travivaĵoj ili ne kapablis al interparolo. Vinicio estis ĝis nun kvazaŭ duonkonscia. Li ripetadis al si, ke Ligia estas savita, ke minacas ŝin plu nek malliberejo, nek morto en la cirko, ke iliaj malfeliĉoj finiĝis por ĉiam kaj ke li prenas ŝin nun hejmen por ne disiĝi plu de ŝi. Kaj ŝajnis al li, ke tio estis pli ĝuste komenco de iu alia vivo ol realaĵo.

De temp' al tempo li kliniĝadis al la malfermita portilo por rigardi tiun karan vizaĝon, kiu en la luna lumo ŝajnis dormanta, kaj li ripetadis en la pensoj:

«Tio estas ŝi! Kristo savis ŝin!»

Li rememoris ankaŭ, ke en la kadavrejon, kien li kaj Urso portis Ligian, venis iu nekonata al li kuracisto kaj certigis, ke la knabino vivos. Ĉe tiu ĉi penso ĝojo tiel ŝveligadis lian bruston, ke en momentoj li malfortiĝadis kaj apogadis sin sur la ŝultro de Urso, ne povante iri propraforte. Urso dume rigardis la stelluman ĉielon kaj preĝis.

Ili iris rapide tra la stratoj, ĉe kiuj novkonstruitaj domoj forte brilis en la luna lumo. La urbo estis malplena.

Nur tie kaj ie aretoj da homoj, kronitaj per hedero, kantis kaj dancis antaŭ portikoj ĉe la sonoj de fluto, ĝuante la belegan nokton kaj la festan tempon, kiu daŭris de la komenco de la cirkoludoj. Nur kiam ili estis jam proksime al la domo, Urso ĉesis preĝi kaj ekparolis mallaŭte, kvazaŭ li timus veki Ligian:

— Sinjoro, estas Kristo, kiu savis ŝin de la morto. Kiam mi ekvidis ŝin sur la kornoj de la uro, mi ekaŭdis en la animo la voĉon: «Defendu ŝin!», kaj ĝi estis sendube la voĉo de la Ŝafido. La malliberejo elsuĉis miajn fortojn, sed li redonis ilin al mi por tiu momento kaj li inspiris tiun sangaman popolon, ke ĝi pledu pro ŝi. Fariĝu lia volo!

Kaj Vinicio respondis:

— Gloregata estu lia nomo!

Sed li ne povis paroli plu, ĉar subite li eksentis, ke grandega ploro ekŝvelas en lia brusto. Kaptis lin neregeb-  
la deziro ĵeti sin teren kaj danki la Savinton pro la miraklo kaj kompato.

Tamen dume ili atingis la hejmon. La servistoj, informitaj de speciale antaŭsendita sklavo, elsvarmis por ilin saluti; Paŭlo el Tarso ankoraŭ en Ancio konvertis pliparton de tiuj homoj. La malfeliĉoj de Vinicio estis al ili bonege konataj, do ilia ĝojo ĉe la vido de la viktimoj, elŝiritaj el la kruelaj manoj de Nerono, estis grandega, kaj ĝi kres-



kis ankoraŭ pli, kiam kuracisto Teoklo, ekzameninte Ligan, deklaris, ke ŝi suferis nenian gravan difekton kaj ke kiam pasos la malforteco, restinta post la mallibereja febro, ŝi resaniĝos.

La konsciencon ŝi reakiris ankoraŭ en la sama nokto. Vekiĝinte en belega dormoĉambro, prilumata per korintaj lampoj, en la aromo de verbeno, ŝi ne sciis, kie ŝi estas kaj kio pri ŝi okazas. Restis en ŝia memoro la momento, kiam ŝi estis alligata al la kornoj de la ĉenkatena uro, kaj nun, vidante super si la vizaĝon de Vinicio, prilumatan per delikata, kolora lumo, ŝi decidis, ke ili certe ne plu estas sur la tero. La pensoj konfuziĝadis en ŝia malforta kapo kaj ŝajnis al ŝi natura afero, ke ili haltis ie envoje al la ĉielo pro ŝia laceco kaj senforteco. Sentante tamen nenian doloron, ŝi ridetis al Vinicio kaj volis demandi, kie ili estas, sed el ŝia buŝo eliĝis nur mallaŭta flustro, en kiu Vinicio apenaŭ povis distingi sian nomon.

Do li genuiĝis apud ŝi kaj, metinte la manon sur ŝian ŝultron, diris:

— Kristo cin savis kaj redonis al mi!

Ŝia buŝo moviĝis denove en nekomprenebla flustro, post momento tamen ŝiaj palpebroj fermiĝis, la brusto levis sin en facila ekspiro, kaj ŝi endormiĝis profunde, kion atendis Teoklo la kuracisto, kaj post kio li antaŭdiris resa-

niĝon.

Vinicio restis apud ŝi, genuante kaj droninte en preĝo. Lian animon enluligis amo tiel grandega, ke li tute ekstaziĝis. Teoklo kelkfoje eniris en la dormoĉambron, kelkfoje el post flankenpuŝita kurteno aperis la orhara kapo de Eŭniko, fine grupoj, tenataj en la ĝardenoj, komencis krii, anoncante la tagiĝon — kaj li plu ĉirkaŭprenadis en la pensoj la piedojn de Kristo, ne vidante kaj ne aŭdante, kio okazas ĉirkaŭe, kun koro ŝanĝita en oferan dankan flamon, dronanta en ekstazo, kvazaŭ vive prenita en la Ĉielon.

## Ĉapitro 68<sup>a</sup>

Petronio, post la liberigo de Ligia, ne volante inciti Neronon, sekvis lin kune kun la aliaj aŭgustanoj sur Palatinon. Li deziris aŭskulti, pri kio oni tie parolos, kaj ĉefe konvinkiĝi, ĉu Tigeleno ne elpensos ion novan por pereigi la knabinon. Certe, kaj ŝi, kaj Urso iĝis nun kvazaŭ zorgatoj de la popolo kaj neniu povis levi kontraŭ ilin la manon, ne kaŭzante ribelon. Tamen Petronio, sciante pri la malamo, kiun havis kontraŭ li la ĉiopova prefekto de la pretorio, supozis, ke verŝajne tiu lasta, ne povante atingi lin rekte, penos ankoraŭ venĝi iel ajn kontraŭ lia nevo.

Nerono estis kolera kaj incitita, ĉar la spektaklo finiĝis tute alie ol li deziris. Petronion li ne volis komence eĉ ri-

gardi, sed tiu, ne perdante la malvarman sangon, proksimiĝis al li kun la tuta facileco de «arbitro de eleganteco» kaj diris:

— Ĉu ci scias, dia, kio venas en mian penson? Verku kanton pri virgulino, kiun la ordono de mondreganto liberigas de la kornoj de uro kaj redonas al ŝia amanto. La grekoj havas sentemajn korojn, kaj mi estas certa, ke ravos ilin tia kanto.

Al Nerono, malgraŭ lia tuta incito, ekplaĉis ĉi tiu ideo, kaj ĝi plaĉis al li duoble: unue, kiel temo por kanto, kaj due, ĉar li povis glori en ĝi sin mem, kiel grandaniman reganton de la mondo, li do rigardis momente Petronion, poste diris:

— Jes! Eble ci pravas! Sed ĉu decas al mi kanti la propran bonecon?

— Ci ne bezonas cin nomi. Ĉiu en Romo divenos sentio, pri kio temas, kaj el Romo la famoj disvastiĝas tra la tuta mondo.

— Kaj ci estas certa, ke tio plaĉos en Aĥajo?

— Je Polukso! — ekkriis Petronio.

Kaj li foriris kontenta, ĉar nun li estis jam certa, ke Nerono, kies tuta vivo konsistis el alkonformigado de la realeco al literaturaj ideoj, ne volos senigi sin de la temo, kaj samfakte ligos la manojn al Tigeleno. Tio tamen ne

ŝanĝis lian intencon forsendi Vinicion el Romo, tuj kiam la sano de Ligia ĉesos prezenti malfacilaĵon. Tial do, ekvidinte lin sekvatage, li diris al la juna tribunuso:

— Veturigu ŝin en Sicilion. Okazis io, ke flanke de la imperiestro nenio vin minacas, sed Tigeleno estus preta uzi eĉ venenon, se ne pro malamo kontraŭ vi, tiam kontraŭ mi.

Vinicio ridetis je tio kaj respondis:

— Ŝi estis sur la kornoj de sovaĝa uro, kaj tamen Kristo ŝin savis.

— Honoru do lin per hekatombo, — respondis Petro nio kun ioma malpacienco, — sed ne postulu, ke li savu ŝin duafoje... Ĉu ci memoras, kiel Eolo akceptis Odiseon, kiam li revenis por peti lin duafoje pri favora ventaro? La dioj ne ŝatas ripetadon.

— Kiam li redonos al ŝi la sanon, — diris Vinicio, — mi veturigos ŝin al Pomponia Grecina.

— Ci agos tiom pli prave, ke Pomponia estas malsana. Ĉi tion diris al mi parenco de la Plaŭcioj, Antistio. Tie ĉi okazos dume tiaj aferoj, ke la homoj forgesos pri vi ambaŭ, kaj en la hodiaŭa tempo plej feliĉaj estas tiuj, pri kiuj oni forgesis. Fortuno estu al vi suno vintre kaj ombro somere!

Dirinte ĉi tion, li lasis Vinicion al lia feliĉo, kaj mem

iris demandi Teoklon pri la sano kaj vivo de Ligia.

Sed ŝi estis jam ekster la danĝero. En la subteraĵo, kun la malforteco, restinta post la mallibereja febro, finmortigus ŝin la putra aero kaj malkomforto, nun tamen ĉirkaŭis ŝin plej sindona zorgemo, kaj ne nur komforto, sed eĉ lukso. Laŭ la ordono de Teoklo post du tagoj oni komencis elportadi ŝin en la ĝardenojn, ĉirkaŭantajn la domon, kie ŝi restadis dum longaj horoj. Vinicio ornamadis ŝian portilon per anemonoj, kaj speciale per iridoj por memori al ŝi la atrion en la domo de Aŭlo. Ofte, kaŝitaj en la ombro de vastfoliaraj arboj, ili interparolis, tenante sin je la manoj, pri la iamaj suferoj kaj la iamaj timoj.

Ligia parolis al li, ke Kristo speciale kondukis lin tra la turmento por ŝanĝi lian animon kaj levi ĝin al Si, kaj li sentis, ke tio estas vero kaj ke restis en li nenio el la antaŭa patricio, kiu konfesis nenian leĝon, krom siaj propraj deziroj. Sed en tiu rememorado estis nenio maldolĉa. Ŝajnis al ili ambaŭ, ke tutaj jaroj flugis jam for kaj ke tiu terura pasinteco estas jam malproksime post ili. Dume ekregadis ilin paco, kian ili neniam spertis ĝis nun. Iu nova vivo, grandega kaj feliĉa, venadis kaj enprenadis ilin.

En Romo Nerono povis furiozi kaj plenigi la mondon je teruro, sed ili, sentante super si gardon centoble pli potencon, ne plu timis lian kruelecon, nek liajn frenezaĵojn,

tute kvazaŭ li ĉesus esti la sinjoro de ilia vivo aŭ morto.

Foje, antaŭ sunsubiĝo, ili ekaŭdis muĝadon de leonoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj, venantan el malproksimaj bestej-oj. Iam tiuj sonoj teruris Vinicion, kiel malbona aŭguro. Nun ili rigardis nur ridetante unu la alian, kaj poste am-baŭ levis la okulojn al la vespera ĉielruĝo.

Iafoje Ligia, ankoraŭ tre malforta kaj ne povanta paŝi propraforte, endormiĝadis meze de la ĝardena trankvilo, dum li gardis ŝin kaj rigardante ŝian dormolulitan vizaĝ-on, pensis malgraŭvole, ke ŝi ne estas plu la sama Ligia, kiun li ekkonis ĉe Aŭlo. Efektive, la malliberejo kaj la malsano parte estingis ŝian belecon. En la tempo, kiam li vidadis ŝin ĉe Aŭlo, kaj poste, kiam li venis por forkapti ŝin el la domo de Mirjam', ŝi estis belega kune kiel statuo kaj floro; nun ŝia vizaĝo iĝis preskaŭ diafana, la brakoj maldikiĝis, la korpo maldikiĝis pro la malsano, la buŝo paliĝis kaj eĉ la okuloj ŝajnis malpli bluaj ol antaŭe.

La orhara Eŭniko, kiu alportadis al ŝi florojn kaj multekostajn teksaĵojn por kovri ŝiajn piedojn, aspektis apud ŝi, kiel la kipra diino. La estetikulo Petronio vane penis trovi en ŝi la iamajn ĉarmojn kaj, movante la ŝul-trojn, li pensis en la animo, ke tiu ombro el la Elizeaj kampoj ne valoris tiujn klopodojn, tiujn dolorojn kaj su-ferojn, kiuj preskaŭ elsuĉis la vivon el Vinicio.

Sed Vinicio, kiu amis nun ŝian animon, amis ŝin nur tiom pli, kaj kiam li gardis la dormantinon, ŝajnis al li, ke li gardas la tutan mondon.

## Ĉapitro 69<sup>a</sup>

La novaĵo pri la mirakla savo de Ligia rapide disvastiĝis inter la kristanaj restuloj, kiuj ĝis nun evitis la pereon en la persekutado. La konfesantoj komencis kunvenadi por vidi tiun, al kiu klare manifestiĝis la favoro de Kristo.

Venis do unue la juna Nazario kun Mirjam', ĉe kiuj rifugiĝis ĝis nun Petro la apostolo, kaj post ili venis aliaj. Ĉiuj ili, kune kun Vinicio, Ligia kaj la kristanaj sklavoj de Petronio, aŭskultis streĉite la rakontadon de Urso pri la voĉo, kiu eksonis en lia animo kaj ordonis al li batali kontraŭ la sovaĝa besto, kaj ĉiuj foriradis kun nova kuraĝo kaj espero, ke Kristo ne permesos tamen ekstermi sur la tero la reston de siaj konfesantoj, antaŭ ol li mem venos fari la teruran juĝon. Kaj tiu espero subtenadis iliajn korojn, ĉar la persekutado ne ĉesis ĝis nun. Kiun ajn la publika famo montris kiel kristanon, tiun la urbaj *vigiloj* tuj forkaptadis en malliberejon. La viktimoj estis jam, vere, malpli multaj, ĉar la plejparton de la konfesantoj oni jam kaptis kaj martirigis antaŭe, kaj la ceteraj aŭ forlasis Romon, por traatendi la uraganon en malproksimaj provin-

coj, aŭ kaŝis sin plej zorge, ne kuraĝante kunvenadi por komunaj preĝoj alie ol en sablofosejoj, troviĝantaj ekster la urbo. Tamen oni persekutis ilin ankoraŭ, kaj malgraŭ ke la cirkoludoj propre estis jam finitaj, oni ilin tenis por la sekvontaj, aŭ juĝis tuj. Kvankam la Roma popolo ne kredis plu, ke la kristanoj estis la kaŭzintoj de la urbobrulo, tamen oni deklaris ilin malamikoj de la homaro kaj de la ŝtato, kaj la edikto kontraŭ ili daŭre validis.

Petro la apostolo longe ne kuraĝis montriĝi en la domo de Petronio, fine tamen unu vesperon Nazario anoncis lian alvenon. Ligia, kiu povis jam iri propraforte, kaj Vinicio eliris al li renkonte kaj komencis ĉirkaŭpreni liajn piedojn; li salutis ilin kun kortuŝo tiom pli granda, ke nemulte restis jam el tiuj ŝafoj, kies regadon Kristo al li konfidis kaj pro kies sorto ploris nun lia granda koro. Tial, kiam Vinicio diris al li: «Sinjoro, dank' al cia propeto la Savinto ŝin redonis al mi», li respondis: «Li ŝin redonis al ci pro cia fido kaj por ke ne eksilentu ĉiuj buŝoj, kiuj konfesas lian nomon». Kaj videble li pensis tiam pri tiuj miloj da siaj infanoj, disŝiritaj de sovaĝaj bestoj, pri tiuj krucoj, per kiuj oni plenŝtopis la arenojn kaj pri tiuj fajraj palisoj en la ĝardenoj de la «Besto», ĉar li diris tion kun grandega doloro.

Vinicio kaj Ligia rimarkis krome, ke liaj haroj tute



blankiĝis, la tuta figuro kliniĝis, kaj en la vizaĝo li havis tiom da malĝojo kaj doloro, kvazaŭ li mem suferus ĉiujn tiujn turmentojn kaj torturojn, kiujn suferis la viktimoj de la furiozo kaj frenezo de Nerono. Sed ili ambaŭ komprenis jam, ke se Kristo mem subiĝis al la turmento kaj morto, neniu povas tion eviti. Tamen iliaj koroj sangis ĉe la vido de la apostolo, premita sub la pezo de la aĝo, penado kaj doloro. Sekve Vinicio, kiu post kelkaj tagoj intencis veturigi Ligian en Neapolon, kie ili celis renkonti Pomponian Grecinan kaj iri pluen en Sicilion, komencis lin petegi, ke li forlasu kune kun ili Romon.

Sed la apostolo metis la manon sur lian kapon kaj respondis:

— Jen mi aŭdas en la animo la vortojn de la Sinjoro, kiu apud la Tiberiada lago diris al mi: «Kiam ci estis pli juna, ci zonadis cin kaj iradis tien, kien ci volis, sed kiam ci maljuniĝos, ci etendos ciajn manojn, kaj iu alia zonos cin kaj kondukos tien, kien ci ne volas». Prave do estas, ke mi sekvu mian ŝafaron.

Kaj kiam ili eksilentis, ne komprenante, kion li diras, li aldonis:

— Mia penado venas al la fino, sed la gastigon kaj ripozon mi trovos nur en la domo de la Sinjoro.

Poste li sin turnis al ili, dirante:

— Memoru pri mi, ĉar mi vin amis, kiel patro amas siajn infanojn, kaj kion ajn vi faros en la vivo, faru ĝin por la gloro de la Sinjoro.

Tiel parolante, li levis super ili siajn maljunajn, tremantajn manojn kaj benis ilin, dum ili premis sin al li, sentante, ke ĝi estas eble la lasta beno, kiun ili ricevas el liaj manoj.

Tamen estis al ili destinite vidi lin ankoraŭ unu fojon. Kelkajn tagojn poste Petronio alportis alarman novaĵon el Palatino. Oni malkovris tie, ke unu el la liberigitoj de la imperiestro estis kristano kaj oni trovis ĉe li leterojn de la apostoloj Petro kaj Paŭlo el Tarso, ankaŭ leterojn de Jakobo, Judo kaj Johano. La restado de Petro en Romo estis jam antaŭe konata al Tigeleno, li supozis tamen, ke li pereis kune kun miloj da aliaj konfesantoj. Nun montriĝis, ke la du ĉefuloj de la nova kredo vivas ĝis nun kaj troviĝas en la ĉefurbo, oni decidis do trovi kaj kapti ilin je ĉia prezo, ĉar oni esperis, ke de post ilia morto la lastaj radikoj de la malamata sekto estos elŝiritaj. Petronio aŭdis de Vesteno, ke Nerono mem ordonis, ke en la daŭro de tri tagoj Petro kaj Paŭlo el Tarso estu jam en la Mamertina malliberejo kaj ke tutaj taĉmentoj da pretorianoj estis senditaj por traserĉi ĉiujn domojn en Transtibero.

Vinicio, aŭdinte tion, decidis averti la apostolon. Ves-

pere li kaj Urso, vestinte sin per gaŭlaj manteloj, kovrantaj la vizaĝojn, iris al la apostolo, loĝanta en la domo de Mirjam', kiu staris ĉe la ekstremo mem de la transtibera urboparto, ĉe la malsupro de la Janikula monteto. Envoje ili vidis domojn, ĉirkaŭitajn de soldatoj, kiujn kondukis iuj nekonataj homoj. La kvartalo estis maltrankvila, kaj kelkloke ariĝis grupetoj da scivoluloj. Tie kaj ie centuries-troj ekzamenis la kaptitojn, demandante ilin pri Petro Simoneo kaj pri Paŭlo el Tarso.

Urso kaj Vinicio, antaŭveninte la soldatojn, atingis tamen feliĉe la loĝejon de Mirjam', kie ili trovis Petron ĉirkaŭita de areto da kredantoj. Apud la apostolo estis ankaŭ Timoteo, helpanto de Paŭlo el Tarso, kaj Lino.

Eksciinte pri la proksima danĝero, Nazario elkondukis ĉiujn tra kaŝita pasejo al la ĝardena pordeto, kaj poste al forlasita ŝtonminejo, troviĝanta kelkcent paŝojn for de la Janikula pordego. Urso devis ĉe tio porti Linon, kies ostoj, rompitaĵoj dum la torturoj, ne kunkreskis ankoraŭ. Troviĝinte tamen fine en la subteraĵo, ili eksentis sin sekuraj kaj ĉe la lumo de meĉlampeto, kiun bruligis Nazario, ili komencis interkonsenti mallaŭte, kiel savi la karan al ili vivon de la apostolo.

— Sinjoro, — diris al li Vinicio, — morgaŭ je tagiĝo Nazario elkonduku cin el la urbo al la Albana montaro.

Tie ni cin retrovos kaj kunprenos en Ancion, kie atendas ŝipo, portonta nin al Neapolo kaj Sicilio. Feliĉa estos la tago kaj la horo, en kiu ci eniros mian domon kaj benos mian hejmofajron.

La aliaj aŭskultis lin kun ĝojo kaj insiste persvadis la apostolon, dirante:

— Rifuĝu for, nia paŝtisto, ĉar ci ne povas resti en Romo. Konservu la vivan veron, por ke ĝi ne pereu kune kun ni kaj ci. Elaŭskultu nin, kiuj cin petegas, kiel patron.

— Faru tion en la nomo de Kristo, — eĥis aliaj, sin kroĉante al lia vesto.

Kaj li respondadis:

— Miaj infanoj! Kiu el ni scias, por kiam la Sinjoro destinis al li la finon de la vivo?

Sed li ne diris, ke li ne forlasos Romon, kaj hezitis mem, kion fari, ĉar delonge jam en lian animon enŝteliĝis necerteco, kaj eĉ teruro. Sed lia ŝafaro estis disbatita, la verko detruita, la eklezion, kiu antaŭ la urbobrulo kreskis simile al impona arbo, ŝanĝis en polvon la potenco de la «Besto»... Restis nenio krom larmoj, krom rememoroj, turmentoj kaj morto. La semado naskigis riĉan rikolton, sed Satano enpremis ĝin en la teron. Anĝelaj taĉmentoj ne venis helpi la pereantojn, kaj nun Nerono etendas sian gloron super la mondo, terura, pli potenca ol iam antaŭe,

sinjoro de ĉiuj maroj kaj de ĉiuj kontinentoj.

Ofte jam la fiŝkaptisto de Dio etendis en soleco la manojn al la ĉielo kaj demandis: «Sinjoro! Kion mi faru? Kiel mi restu? Kaj kiel mi, senforta maljunulo, batalu kontraŭ tiu senlima potenco de la Malbono, al kiu ci permesis regi kaj venkadi?»

Kaj li vokis tiel el la fundo de senborda doloro, ripetante en la animo: «Ne estas jam plu tiuj ŝafoj, kiujn ci ordonis al mi paŝti, ne estas plu cia eklezio, malpleno kaj funebro regas en cia metropolo, do kion ci ordonas al mi nun? Ĉu mi restu ĉi tie aŭ elkonduku la reston de ciaj ŝafoj, ke ni ie trans maroj gloru kaŝite cian nomon?»

Kaj li hezitis. Li kredis, ke la viva vero ne pereos kaj devas venki, sed iafoje li pensis, ke ne estis ankoraŭ ĝia tempo, kiu venos nur tiam, kiam la Sinjoro malsupreniros sur la teron en la tago de la juĝo, kun gloro kaj povo centoble pli potenca ol tiu de Nerono.

Iafoje ŝajnis al li, ke se li mem forlasos Romon, la kredantoj sekvos lin, kaj tiam li kondukos ilin for, al la ombrodonaj boskoj de Galileo, al la kvietaj akvaro de l' Tiberiada lago, al la paŝtistoj, mildaj kiel kolomboj aŭ kiel la ŝafoj, kiuj paŝtas sin tie meze de timianoj kaj nardoj. Kaj ĉiam pli granda deziro de trankvilo kaj ripozo, ĉiam pli granda sopiro al la lago kaj al Galileo ekregadis la koron

de la fiŝkaptisto, ĉiam pli oftaj larmoj ŝveladis en liaj okuloj.

Sed kiam li momente jam estis decidinta, ekregadis lin subita timo kaj maltrankvilo. Kiel li forlasu la urbon, kie tiom da martira sango sorbiĝis en la teron, kie tiom da buŝoj de agoniantoj atestis pri la vero? Ĉu li sola forkliniĝu de tio? Kaj kion li respondos al la Sinjoro, kiam li ek-aŭdos la vortojn: «Jen ili ĉiuj mortis pro sia kredo, kaj ci forkuris?»

Tagojn kaj noktojn li pasigadis en zorgo kaj aflikto. Aliaj, kiujn disŝiris la leonoj, kiujn oni alnajlis al la krucoj, kiujn oni bruligis en la imperiestraj ĝardenoj, post la momentoj de turmento endormiĝis en la Sinjoro, li tamen ne povis dormi kaj sentis turmenton pli grandan ol ĉiuj, kiujn la torturistoj elpensis por la viktimoj. La tagiĝo ofte blankigadis jam la tegmentojn de domoj, kiam li vokis ankoraŭ en la fundo de sia dolorplena koro:

— Sinjoro, kial ci ordonis al mi veni ĉi tien kaj en tiu ĉi nesto de l' Besto fondi cian metropolon?

Dum tridek kvar jaroj de post la morto de sia Sinjoro li ne konis ripozon. Kun bastono en la mano li migris tra la mondo kaj rakontadis la «bonan novaĵon». Liaj fortoj elĉerpiĝis en la vojaĝoj kaj penoj, ĝis fine, kiam en tiu ĉi urbo, kiu estis la kapo de la mondo, li enradikigis la verk-

on de la Majstro, unu fajra ekspiro de la Malbono bruligis ĝin, kaj li vidis, ke la batalon oni devas komenci denove. Kaj kian batalon! Unuflanke la imperiestro, la senato, la popolo, la legioj, katenantaj per fera ĉirkaŭligo la tutan mondon, la sennombraj urboj, la sennombraj landoj, la potenco, al kiu egalan ne vidis homaj okuloj, aliflanke li, tiel premita de la aĝo kaj laboro, ke liaj tremantaj manoj apenaŭ povis jam porti la vojiran bastonon.

Do iafoje li diradis al si, ke ne li povas batali kontraŭ la imperiestro de Romo kaj ke tion povas fari nur Kristo mem.

Ĉiuj tiuj pensoj trakuradis nun lian afliktitan kapon, kiam li aŭskultis la petojn de la lasta areto de siaj fideluloj, kaj ili, ĉirkaŭante lin per rondo ĉiam pli malvasta, ripetadis per tremantaj voĉoj:

— Rifuĝu for, rabeno, kaj elkonduku nin el la potenco de la Besto.

Fine ankaŭ Lino klinis antaŭ li sian turmentitan kapon.

— Sinjoro! — li diris, — la Savinto ordonis al ci, ke ci paŝtu liajn ŝafojn, sed ili ne estas plu ĉi tie, aŭ morgaŭ ili ne estos, iru do tien, kie ci ankoraŭ povas trovi ilin. La vorto de Dio vivas ankoraŭ en Jerusalemo kaj en Antioĥio kaj en Efezo kaj en aliaj urboj. Kion ci efikos, restinte

en Romo? Se ci pereos, ci grandigos nur la triumfon de la Besto. Al Johano la Sinjoro ne difinis la limon de la vivo, Paŭlo estas roma civitano kaj senjuĝe oni ne povas lin puni, sed se kontraŭ ci, ho majstro, ekfuriozos la infera potenco, tiam tiuj, kiuj senkuraĝiĝis jam en la koroj, demandas: «Kiu estas pli granda ol Nerono?» Ci estas la roko, sur kiu estas konstruita la Eklezio de Dio. Lasu nin morti, sed ne permesu al Antikristo venki la reprezentanton de Dio, kaj ne revenu ĉi tien, antaŭ ol la Sinjoro polvigos tiun, kiu fluigis la senkulpan sangon.

— Rigardu niajn larmojn! — ripetis ĉiuj ĉeestantoj.

Larmoj fluis ankaŭ sur la vizaĝo de Petro. Tamen post momento li leviĝis kaj, etendinte super la genuantoj la manojn, diris:

— Glorata estu la nomo de la Sinjoro kaj fariĝu lia volo!



## Ĉapitro 70<sup>a</sup>

Je la krepusko de la sekvinta mateno du malhelaj figuroj iris la Appian vojon al la ebenaĵoj de Kampanio. Unu el ili estis Nazario, la alia Petro la apostolo, forlasanta Romon kaj la tie martirigatajn samkredanojn.

La ĉielo en la oriento estis jam ricevanta palan verdetan nuancon, kiu iom post iom ĉiam pli klare borderiĝadis malsupre per la safrana koloro. La arboj kun arĝentaj folioj, la blankaj marmoroj de vilaoj kaj la arkaĵoj de la akveduktoj, tirantaj sin tra la ebenaĵo al la urbo, elprofundiĝadis el la ombro. Plilumiĝadis grade la verdeco de la ĉielo, saturiĝante je orkoloro. Poste la sunleviĝo komencis rozbrili kaj lumigis la Albanan montaron, kiu elaperis mirinda, palviola, kvazaŭ el nuraj briloj konsistanta.

La tagiĝo spegulis sin en rosgutoj, tremantaj sur la folioj. La nebulo maldensiĝadis, malkovrante al la okuloj ĉiam pli vaste la ebenaĵon, la sur ĝi troviĝantajn domojn, tombejojn, urbetojn kaj arbotufojn, inter kiuj blankis la kolonoj de temploj.

La vojo estis senhoma. La kamparanoj, kiuj portadis legomojn en la urbon, ne aljungis ankoraŭ videble siajn veturilojn. De la ŝtonplatoj, per kiuj la vojo estis pavimita ĝis la montaro, disiradis en la silento la rebruo de lignaj

ŝuoj, kiujn la vojaĝantoj havis sur la piedoj.

Poste la suno elaperis trans la montaraj interpintoj, sed kune stranga vido frapis la okulojn de la apostolo. Ekŝajnis al li, ke la ora disko, anstataŭ leviĝadi ĉiam pli alten sur la ĉielo, deŝovis sin de la montetoj kaj ruliĝas sur la vojo.

Tiam Petro haltis kaj diris:

— Ĉu ci vidas tiun lumon, kiu proksimiĝas al ni?

— Mi vidas nenion, — respondis Nazario.

Sed Petro post momento ekparolis, ŝirminte la okulojn per la mano:

— Iu venas al ni en la suna brilo.

Iliajn orelojn tamen ne atingis plej eta rebruo de paŝoj. Ĉirkaŭe estis tute silente, Nazario vidis nur, ke for, malproksime, tremas la arboj, kvazaŭ iu ilin skuus, kaj la brilo disverŝiĝas ĉiam pli vaste sur la ebenaĵo.

Li ekrigardis kun miro la apostolon.

— Rabeno! Kio estas al ci? — li ekkriis maltrankvile.

La vojaĝa bastono falis teren el la manoj de Petro, liaj okuloj fikse rigardis antaŭen, lia buŝo estis malfermita, sur la vizaĝo bildiĝis miro, ĝojo, ravo. Subite li ĵetis sin surgenuen kun brakoj etenditaj antaŭen, kaj el lia buŝo eliĝis la ekkrio:

— Ho Kristo!... Kristo!...

Kaj li falis vizaĝaltere, kvazaŭ li kiskus ies piedojn. Longe daŭris la silento, poste en la mallaŭto aŭdiĝis plorrompataj vortoj de la maljunulo:

— Kien ci iras, Sinjoro?...

Nazario ne aŭdis respondon, sed la orelojn de Petro atingis voĉo malgaja kaj dolĉa, kiu diris:

— Kiam ci forlasas mian popolon, mi iras Romon, por ke oni krucumu min tie duafoje.

La apostolo kuŝis surtere, kun vizaĝo en la polvo, senmova kaj silenta.

Al Nazario ŝajnis jam, ke Petro svenis aŭ mortis, sed li leviĝis fine, per la tremantaj manoj prenis la pilgriman bastonon kaj, nenion dirante, returniĝis al la sep montetoj de la urbo.

Kaj la knabo, vidante ĉi tion, ripetis, kiel eĥo:

— Kien ci iras, sinjoro?...

— Romon, — respondis mallaŭte la apostolo.

Kaj li revenis.

Paŭlo, Johano, Lino kaj ĉiuj kredantoj akceptis lin kun miro kaj timo tiom pli granda, ke ĝuste je la krepusko, tuj post lia eliro, pretorianoj ekĉirkaŭis la loĝejon de Mirjam' kaj serĉis en ĝi la apostolon. Sed al ĉiuj iliaj demandoj li respondadis nur kun ĝojo kaj trankvilo:

— Mi vidis la Sinjoron.

Kaj ankoraŭ en la sama vespero li iris en la tombejon en Ostriano por instrui kaj bapti tiujn, kiuj volis baniĝi en la akvo de l' vivo.

De tiam li venadis tien ĉiutage, kaj post li venadis amasoj, ĉiutage pli grandaj. Ŝajnis, ke el ĉiu martira larmo naskiĝas novaj konfesantoj kaj ke ĉiu ĝemo sur la areno eĥiĝas en miloj da brustoj. La imperiestro vadis en sango, Romo kaj la tuta idolana mondo frenezis. Sed tiuj, kiuj jam havis sufiĉe da krimoj kaj frenezaĵoj, tiuj, kiujn oni piedpremis, tiuj, kies vivo estis konstanta malbonsorto kaj sufero, ĉiuj premitoj, ĉiuj malĝojantoj, ĉiuj malfeliĉuloj venadis por aŭskulti la strangan rakonton pri Dio, kiu pro amo al la homoj lasis sin krucumi por elaĉeti iliajn kulp-ojn.

Trovante Dion, kiun ili povis ami, ili trovis tion, kion al neniu povis doni ĝis tiu momento la tiama mondo: la feliĉon pro amo.

Kaj Petro ekkomprenis, ke nek la imperiestro, nek ĉiuj liaj legioj venkos la vivan veron, ke superverŝos ĝin nek larmoj, nek sango kaj ke nur nun komenciĝas ĝia venko. Li ekkomprenis ankaŭ, kial la Sinjoro revenigis lin de la vojo: ĉar tiu ĉi urbo de fiereco, krimoj, malĉasteco kaj potenco komencis esti lia urbo kaj duobla metropolo, el kiu

fluis sur la tutan mondon la komando de la korpoj kaj de la animoj.

## Ĉapitro 71<sup>a</sup>

Fine plenumiĝis la tempo de ambaŭ apostoloj. Sed, kvazaŭ por finkroni la laboron, estis lasite al la fiŝkaptisto de Dio kapti du animojn eĉ en la malliberejo. La soldatoj Proceso kaj Martiniano, kiuj gardis lin en la Mamertina malliberejo, akceptis bapton. Poste venis la horo de la turlibereco. Nerono ne estis tiam en Romo. La verdikton eldonis Helio kaj Politeto, al kiuj Nerono konfidis la regadon en Romo por la tempo de sia foresto.

La aĝan apostolon oni subigis unue al la leĝordonita skurĝado, kaj sekvatage oni lin elkondukis ekster la urban muregon, al la Vatikanaj montetoj, kie li devis suferi la al li destinitan krucpunon. La soldatojn mirigis la amaso, kiu kolektiĝis antaŭ la malliberejo, ĉar laŭ ilia imago la morto de simpla homo, plie de fremdulo, ne devus eksciti tian intereson, kaj ili ne komprenis, ke tiu ĉi aro ne konsistis el scivoluloj, sed el konfesantoj, kiuj deziris akompani al la loko de ekzekuto la grandan apostolon. Posttagmeze malfermiĝis fine la mallibereja pordego kaj Petro aperis meze de pretoriana taĉmento. La suno malleviĝis jam al Ostio, la tago estis serena kaj bela. Pro lia alta aĝo oni ne

devigis Petron porti la krucon, ĉar oni kredis, ke li ne povus ĝin levi, nek oni metis forkegon sur lian kolon por ne malfaciligi la iradon. Li paŝis libera kaj la kredantoj povis vidi lin bonege.

En la momento, kiam meze de la feraj soldataj kaskoj aperis lia blanka kapo, ploro aŭdiĝis en la amaso, sed preskaŭ tuj ĝi ĉesis, ĉar en la vizaĝo de la maljunulo estis tiom da sereneco kaj tia ĝojo de ĝi radiis, ke ĉiuj komprenis, ke tio ne estas viktimo, kondukata al ekzekuto, sed venkinto, festanta sian triumfan marŝon.

Tiel estis efektive. La fiŝkaptisto, ordinare humila kaj klinita, iris nun rekta, superanta per la kresko la soldatojn, plena je digno. Neniam oni vidis en lia sinteno tian majestecon. Ŝajnis, ke tio estas monarĥo, kiu paŝas antaŭen, ĉirkaŭita de siaj soldatoj kaj popolo. De ĉiuj flankoj eksonis la voĉoj:

— Jen Petro foriras al la Sinjoro.

Ĉiuj kvazaŭ forgesis, ke atendas lin turmento kaj morto. Ili iris solene, sed trankvile, sentante, ke de post la morto sur Golgoto okazis ĝis nun nenio egale granda, kaj ke kiel la unua elaĉetis la tutan mondon, tiel ĉi tiu elaĉetos tiun ĉi urbon.

Ĉe la vido de la maljunulo pasantoj haltadis envoje kun miro, kaj la konfesantoj, metante la manojn sur iliajn

Ŝultrojn, parolis per trankvilaj voĉoj:

— Rigardu, kiel mortas la justulo, kiu konis Kriston kaj predikis amon en la mondo.

Kaj tiuj ekmeditadis, poste foriradis, dirante al si: «Vere, ĉi tiu ne povis esti maljusta».

Envoje silentiĝadis la strata kriado kaj bruado. La procesio iris antaŭen meze de nove konstruitaj domoj, meze de blankaj kolonoj de temploj, super kies frontonoj etendis sin la ĉielo, profunda, paca kaj blua. Ili iris en silento; iafoje nur ektintis la soldataj armiloj aŭ ekmurmuris la flustro de preĝoj. Petro aŭskultis ilin kaj ĝojo ĉiam pli granda lumis sur lia vizaĝo, ĉar lia rigardo apenaŭ povis ĉirkaŭpreni tiujn milojn da konfesantoj. Li sentis, ke li plenumis la taskon, kaj li sciis jam, ke tiu vero, kiun li predikis dum la tuta vivo, surverŝos ĉion, kiel ondo, kaj ke nenio jam povos ĝin bari.

Tiel pensante, li levis la okulojn supren kaj diris: «Sinjoro, ci ordonis al mi konkeri ĉi tiun urbon, do mi ĝin konkeris. Ci ordonis al mi fondi ĉi tie cian metropolon, do mi ĝin fondis. Ĝi estas nun cia urbo, Sinjoro, kaj mi iras al ci, ĉar multa estis mia penado.»

Pasante preter temploj, li parolis al ili: «Temploj de Kristo vi estos».

Rigardante la homajn amasojn, svarmantajn preter li,

li parolis al ili: «Servantoj de Kristo estos ciam infanoj.»

Kaj li iris, konscia pri la plenumita laboro, konscia pri sia merito, pri la povo, pacoplena, granda. La soldatoj irigis lin tra la Triumfa ponto<sup>330</sup>, kvazaŭ malgraŭvole atestante alian triumfon, kaj kondukis lin pluen, al la Naŭmaĥiejo kaj al la cirko. La kredantoj el Transtibero aliĝis al la procesio kaj tiel densa iĝis la popolamaso, ke la centuriestro, komandanta la pretorianojn, diveninte fine, ke li kondukas iun ĉefpastron, kiun ĉirkaŭas liaj fideluloj, maltrankviliĝis pro la tro malgranda nombro da soldatoj. Sed eĉ ne unu ekkrio de indigno aŭ furiozo aŭdiĝis en la amaso. La vizaĝoj, spegulantaj la gravecon de la momento, estis solenaj kaj kune plenaj je atendo, ĉar kelkaj el la konfesantoj, rememorante, ke ĉe la morto de la Sinjoro la tero fendis sin pro teruro kaj mortintoj levis sin el la tomboj, pensis, ke eble ankaŭ nun okazos iuj videblaj signoj, post kiuj la memoro pri la morto de la apostolo ne forviŝiĝos dum jarcentoj. Aliaj parolis eĉ al si: «Ĉu eble la Sinjoro elektos la mortohoron de Petro por malsupreniri el la ĉielo, kiel li promesis, kaj fari juĝon kontraŭ la mondo?» Kaj en tiu penso ili konfidis sin al la kompatemo de la Savinto.

Sed ĉirkaŭe estis trankvile. La montetoj ŝajnis ĝui la

<sup>330</sup> Pons Triumphalis. (Noto de la aŭtoro.)



varmon kaj ripozi en la suno. La procesio haltis fine inter la cirko kaj la Vatikana monteto. Soldatoj komencis nun fosi kavon, aliaj metis sur la teron la krucon, martelojn kaj najlojn, atendante, ĝis la preparoj estos finitaj, dum la amaso, plu trankvila kaj solena, genuiĝis ĉirkaŭe.

La apostolo, kun la kapo en radioj kaj oraj briloj, sin turnis lastfoje al la urbo. Fore, iom sube, vidiĝis la brilanta Tibero; trans ĝi la Kampo de Marso; pli supre la maŭzoleo de Aŭgusto; sube la grandega banejo, kiun Nerono ĵus komencis konstrui; pli sube ankoraŭ, la teatro de Pompeo; kaj trans ili *Sæpta Julia*,<sup>331</sup> parte videbla, parte kaŝita de aliaj konstruaĵoj; multego da portikoj, temploj, kolonoj, tavolo leviĝantaj konstruaĵoj; kaj fine for, malproksime, la montetoj, ĉirkaŭgluitaj per domoj — grandega homa svarmejo, kies limoj estis malaperantaj en blueta nebulo, nesto de krimo, sed ankaŭ de forto, de frenezo, sed ankaŭ de ordo, kiu iĝis la kapo de la mondo, sed kune ĝia leĝo kaj paco, ĉiopova, nevenkebla, eterna.

Petro, ĉirkaŭita de la soldatoj, rigardis ĝin tiel, kiel rigardus sian posedaĵon reĝo kaj estro. Kaj li parolis al ĝi: «Ci estas elaĉetita kaj mia». Neniu tamen, ne nur el la soldatoj, fosantaj la kavon, en kiun estis metota la kruco, sed eĉ neniu el la konfesantoj scipovis diveni, ke efektive

<sup>331</sup> Konstruaĵo en la Kampo de Marso, kie la civitanoj kunvenis por voĉdoni.

staras inter ili la vera reganto de ĉi tiu urbo, ke malaperos la imperiestroj, trafluos ondoj da barbaroj, jarcentoj pasos, kaj tiu ĉi maljunulo regos ĉi tie senhalte.

La suno ankoraŭ iom malleviĝis al Ostio, ĝi iĝis granda kaj ruĝa. La tuta okcidenta parto de la ĉielo ekflamis per blindiga brilo. La ekzekutistoj proksimiĝis al Petro por lin senvestigi.

Sed li, preĝante, subite rektiĝis kaj alten etendis la dekstran brakon. La ekzekutistoj haltis, kvazaŭ senkuraĝigite per lia sinteno; ankaŭ la konfesantoj haltigis la spiron en la brustoj, atendente ke li ekparolos. Estiĝis profunda silento.

Kaj li, starante sur la altaĵo, komencis fari per la etendita mano la signon de kruco, benante en la horo de sia morto:

— *Urbi et orbi!*<sup>332</sup>

En tiu sama mirinda vespero alia taĉmento da soldatoj kondukis sur la Vojo Ostia Paŭlon el Tarso al la loko nomata «Fontoj Salviaj»<sup>333</sup>. Ankaŭ lin sekvis aro da kredantoj, kiujn li estis konvertinta, kaj kiam li rekonadis vazaĵ-

<sup>332</sup> Al la Urbo [t.e. Romo] kaj la mondo (lat.) — formulo per kiu en la antikva Romio komenciĝis gravaj proklamoj. Almenaŭ de la 13<sup>a</sup> jc tiel nomiĝas la «apostolaj benoj» donataj de la papo de Romo en gravaj okazoj.

<sup>333</sup> Latine *Aquæ Salviæ* — loko en Romo kie nun situas la preĝejo «S-ta Paŭlo ĉe la Tri Fontoj» (itale *San Paolo alle Tre Fontane*).

ojn amikajn, li haltadis kaj parolis kun ili, ĉar la gardistoj elmontradis al li, kiel al roma civitano, pli da konsideroj. Post la pordego, nomata Tergemina, li renkontis Plaŭtillan, filinon de prefekto Flavio Sabeno<sup>334</sup>, kaj vidante ŝian junan vizaĝon, surverŝitan de larmoj, diris:

— Plaŭtilla, filino de la eterna Savo, foriru en paco. Nur pruntu al mi vualon, kiun oni ligos ĉirkaŭ miaj okuloj en la momento, kiam mi estos foriranta al la Sinjoro.

Kaj preninte la vualon, li iris pluen kun vizaĝo tiel plena je ĝojo, kun kia revenas hejmen laboristo, honeste laborinta la tutan tagon. Liaj pensoj, simile al tiuj de Petro, estis trankvilaj kaj serenaj, kiel tiu vespera ĉielo. La okuloj medite rigardis la ebenaĵon, kiu etendis sin antaŭ li, kaj la Albanan montaron, dronantan en lumo. Li rememradis siajn vojaĝojn, sian penadon kaj laboron, la batalojn, en kiuj li venkis, kaj la komunumojn, kiujn li fondis en ĉiuj landoj kaj trans ĉiuj maroj, kaj li pensis, ke li bone meritis la ripozon. Ankaŭ li plenumis sian taskon. Li sentis, ke lian semaĵon jam ne disblovos la vento de malbono. Li sin preparis al la foriro kun la certeco, ke en la batalo, kiun lia vero proklamis kontraŭ la mondo, ĝi venkos, kaj

---

<sup>334</sup> *Titus Flavius Sabinus* (m. 69 p.K.) — la pli aĝa frato de Vespaziano, konsulo de la jaro 47<sup>a</sup>. Laŭ kristana legendo, lia edzino estis Plaŭcia (*Plaŭtia*), filino de Aŭlo Plaŭcio; kaj tial la nomo *Plaŭtilla* por ilia filino, la nepino de la Plaŭcioj.

senlima sereneco enfluadis lian animon.

La vojo al la loko de la ekzekuto estis malproksima kaj la vespero komencis krepuski. La montoj iĝis purpuraj, kaj iliaj bazoj iom post iom sinkis en ombron. Brutaroj estis revenantaj hejmen. Tie kaj ie iris aretoj da sklavoj kun laborinstrumentoj sur la ŝultroj. Antaŭ la domoj, sur la vojo ludis infanoj, rigardante scivole la pasantan taĉmenton. Kaj en ĉi tiu vespero, en ĉi tiu klara, ora aero estis ne nur trankvilo kaj paco, sed ankaŭ ia harmonio, kiu ŝajnis levi sin de la tero al la ĉielo. Paŭlo aŭdis ĝin kaj lia koro pleniĝadis je ĝojo ĉe la penso, ke al tiu muziko de la mondo li aldonis unu sonon, kiu mankis ĝis nun, kaj sen kiu la tuta tero estis kiel «sonanta kupro aŭ tintanta cimballo»<sup>335</sup>.

Kaj li rememoris, kiel li instruadis al la homoj la amon, kiel li diradis al ili, ke eĉ se ili disdonus sian havaĵon inter malriĉulojn kaj eĉ se ili ekkonus ĉiujn lingvojn kaj ĉiujn misterojn kaj ĉiujn sciencojn, ili estos nenio sen la amo, kiu estas plenfavora, pacienca, kiu ne faras malbonon, ne deziras adoron, ĉion elportas, al ĉio kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas.

Li pasigis la jarojn de sia vivo instruante al la homoj tiun veron. Kaj nun li diris al si en la animo: kia potenco

---

<sup>335</sup> 1Kor 13:1.

ĝin egalas kaj kio ĝin venkos? Kiel povas ĝin subpremi la imperiestro, se li eĉ havus duoble tiom da legioj, duoble tiom da urboj kaj maroj kaj landoj kaj nacioj?

Kaj li iris preni sian pagon, kiel triumfanto.

La irantaro forlasis fine la grandan vojon kaj flankiĝis orienten per mallarĝa irejo al la Fontoj Salviaj. Sur la erikejo kuŝis ruĝaj sunbriloj. Ĉe la fonto la centuriestro haltigis la soldatojn, ĉar la momento venis.

Sed Paŭlo, ĵetinte sur la ŝultron la vualon de Plaŭtilla por kovri per ĝi siajn okulojn, lastfoje levis la pupilojn, plenajn je senlima trankvilo, al la pratempaj briloj de la vespero kaj preĝis. Jes! La momento venis, sed li vidis antaŭ si grandegan vojon el vesperbriloj, kondukantan al la ĉielo, kaj en la animo li diris al si la samajn vortojn, kiujn li skribis antaŭe, konscia pri sia plenumita servo kaj pri la baldaŭa fino: «Bonan batalon mi batalis, mi finis la kuradon, mi gardis la fidon; de nun estas konservita por mi la krono de justeco»<sup>336</sup>.

---

<sup>336</sup> 2Tim 4:7-8.

## Ĉapitro 72<sup>a</sup>

Romo furiozis, kiel antaŭe, tiel ke ŝajnis, kvazaŭ tiu urbo, kiu konkeris la mondon, komencas fine, pro manko de gvidantoj, disŝiri sin interne. Eĉ antaŭ ol ekbatis la lasta horo de la apostoloj, venis la konspiro de Pizono, kaj post ĝi sekvis tiel senpardona falĉado de la plej altaj kapoj en Romo, ke eĉ al tiuj, kiuj vidis dion en Nerono, li ekŝajnis fine dio de morto. Funebro falis sur la urbon, teruro ekloĝis en la domoj kaj koroj, sed la portikojn kronis hederu kaj floroj, ĉar malpermesite estis elmontri ĉagrenon pro la mortintoj. La homoj, kiuj vekiĝadis matene, demandis sin, kies vico venos hodiaŭ. La procesio da fantomoj, tiriĝantaj post Nerono, kreskis kun ĉiu tago.

Pizono pripagis la konspiron per sia kapo; post li sekvis Seneko kaj Lukano; Fenio Rufo kaj Plaŭcio Laterano; kaj Flavio Sceveno, kaj Afranio Kvintiano, kaj la diboĉema ludkamarado de la imperiestro Tulio Seneciono, kaj Prokulo, kaj Arariko, kaj Tugureno, kaj Grato, kaj Silano, kaj Proksimo, kaj Subrio Flavio, iam tutanime fidela al Nerono, kaj Sulpicio Aspero. Kelkajn pereigis la propra malnobleco, aliajn timemo, aliajn riĉaĵoj, aliajn braveco. Nerono, terurite per la sola nombro de la konspirantoj, kovris la muregojn per soldatoj kaj tenis la urbon kvazaŭ sie-

ĝe, sendante ĉiutage centuriestrojn kun mortverdiktoj en suspektatajn domojn. La kondamnitoj rampis ankoraŭ humile en leteroj, plenaj je flatoj, dankante la imperiestron pro la verdikto kaj testamentante al li parton de sia havaĵo por savi la reston por la infanoj. Ŝajnis fine, ke Nerono speciale transpasas ĉian mezuron por konvinkiĝi, kigrade malnobliĝis la homoj kaj kiel longe ili toleros la sangan regadon. Post la konspirantoj oni ekstermadis iliajn parencojn, amikojn kaj eĉ nurajn konatojn. La loĝantoj de luksaj domoj, konstruitaj post la brulo, elirante sur la straton, estis certaj, ke ili vidos tutajn vicojn da enterigoj.

Pompeo, Kornelio Marcialo, Flavio Nepoto kaj Stacio Domicio pereis, akuzite pri manko de amo al la imperiestro; Novio Prisko kiel amiko de Seneko; Rufrio Krispeno estis senigita de la rajto je fajro kaj akvo tial, ke li estis iam edzo de Popea. La grandan Trazeon pereigis lia virto, multaj pagis per la vivo la altan devenon, kaj eĉ Popea iĝis viktimo de momenta ekscito de Nerono.

Kaj la senato rampis antaŭ la terura regnestro, konstruadis je lia honoro templojn, faradis oferdonojn pro lia voĉo, florkronadis liajn statuojn kaj destinadis al li pastruojn kiel al dio. La senatanoj kun tremo en la animoj iradis Palatinon por glori la kanton de la «Periodoniko» kaj di-

boĉi kune kun li meze de orgioj de nudaj korpoj, vino kaj floroj.

Kaj dume malsupre, sur la grundo, inundite per sango kaj larmoj, kreskis mallaŭte, sed ĉiam pli potence, la sem-aĵo de Petro.

## Ĉapitro 73<sup>a</sup>

Vinicio al Petronio:

*«Ni scias ankaŭ ĉi tie, mia kara, kio okazas en Romo, kaj kion ni ne scias, tion findiras al ni cial leteroj. Se oni ĵetas ŝtonon en akvon, la ondoj disiras ĉirkaŭen, ĉiam pli kaj pli malproksimen, do tia ondo de frenezo kaj furiozo atingis el Palatino eĉ ĉi tien. Envoje al Grekujo estis ĉi tie la sendito de la imperiestro, Karinato, kiu prirabis la urbojn kaj templojn por plenigi la malplenan trezorejon. Per la kosto de ŝvito kaj homaj larmoj oni konstruas en Romo la Oran Domon<sup>337</sup>. Povas esti, ke la mondo ne vidis ĝis nun tian domon, sed ĝi ankaŭ ne vidis tiajn maljustaĵojn. Ci konas ja Karinaton. Simila al li estis Ĥilono, antaŭ ol li pentis sian vivon per la morto. Sed la urbetojn, kuŝantajn proksime de ni, ne atingis ankoraŭ liaj homoj, eble tial, ke estas ĉi tie nek temploj, nek trezoroj.*

<sup>337</sup> Latine *Domus aurea* — grandega palaca-parka komplekso en Romo, kiun Nerono konstruigis post la brulego de la 64<sup>a</sup> jaro.



*Ci demandas ĉu ni estas sekuraj. Mi respondos al ci nur, ke ni estas forgesitaj, kaj tion akceptu kiel respondon.*

*Jen en la nuna momento el la portiko, kie mi skribas, mi vidas nian trankvilan golfon kaj sur ĝi, en boato, Urson, mallevanta reton en la klaran ondaron. Mia edzino ŝpinas ruĝan lanon apud mi, kaj en la ĝardenoj, en la ombro de migdalarboj, kantas niaj sklavoĵoj. Ho, kia trankvilo, mia kara, kaj kia forgeso pri la antaŭaj teruroj kaj doloroj! Sed tion ni ŝuldas ne al Parcoj, kiuj, kiel ci skribas, ŝpinas tiel dolĉe la fadenon de nia vivo; tio estas la beno de Kristo, nia amata Dio kaj Savinto. La suferojn kaj larmojn ni konas, ĉar nia vero ordonas al ni priplori fremdan mizeron, sed eĉ en tiuj larmoj estas de vi nekonata konsolo, ke iam, kiam forpasos la tempo de nia vivo, ni retrovos ĉiujn tiujn karajn personojn, kiuj pereis kaj pereos ankoraŭ pro la Dia instruo. Por ni Petro kaj Paŭlo ne mortis, sed naskiĝis en gloro. Niaj animoj vidas ilin kaj, dum la okuloj ploras, la koroj ĝojas ilian ĝojon. Ho jes, kara, ni estas feliĉaj per feliĉo, kiun nenio kapablas detrui, ĉar la morto, kiu estas por vi la fino de ĉio, por ni estas nur paso al ankoraŭ pli granda trankvilo, al pli granda amo, al pli granda ĝojo.*

*Kaj tiel fluas ĉi tie niaj tagoj kaj monatoj en trankvilo de la koroj. Niaj servistoj kaj sklavoĵoj kre-*

*das, kiel ni, je Kristo, kaj ĉar li ordonis amon, ni amas unu la aliajn. Ofte, kiam la suno subiras, aŭ kiam la luno brilas jam sur la akvo, mi kaj Ligia interparolas pri la pasinta tempo, kiu nun ŝajnas al ni sonĝo, kaj kiam mi pensas, kiel ĉi tiu kara kapo, kiun mi nun ĉiutage lulas sur la brusto, proksima estis al turmento kaj pereco, mi gloras tutanime mian Sinjoron, ĉar li sola povis ŝin elŝiri el tiuj manoj, savi el la areno kaj redoni al mi por ĉiam.*

*Ho Petronio, ci ja vidis, kiom da konsolo kaj persisto en mizero, kiom da pacienco kaj kuraĝo kontraŭ la morto donas ĉi tiu instruo, venu do kaj vidu, kiom da feliĉo ĝi donas en la ordinaraj, ĉiutagaj horoj de nia vivo. Vidu, la homoj ne konis ĝis nun Dion, kiun ili povus ami, tial do ili ne amis unu alian kaj tio estis la fonto de ilia mizero, ĉar, kiel lumo el la suno, tiel la feliĉo venas el amo. Ne instruis al ili tiun veron leĝodonantoj, nek filozofoj, kaj ĝi estis nek en Grekujo, nek en Romo, kaj se mi diras: nek en Romo, ĝi signifas: nek sur la tuta tero. La seka kaj malvarma instruo de la stoikistoj, kiu altiras virtulojn, hardas la korojn, kiel glavojn, sed pli ĝuste indiferentigas ilin anstataŭ bonigi. Sed por kio mi diras tion al ci, kiu studis pli multe kaj komprenas pli multe ol mi. Ĝa ankaŭ ci konis Paŭlon el Tarso kaj ofte ci longe kun li parolis, do ci scias plej bone, ĉu kontraŭ tiu vero, kiun li pro-*

klamis, ĉiuj instruoj de viaj filozofoj kaj retoroj ne estas kiel pereemaj sapvezikoj kaj kiel vanaj sonoj sen signifo. Ĉu ci memoras la demandon, kiun li faris al ci: „Kaj se la imperiestro estus kristano, ĉu vi ne sentus vin pli sekuraj, pli certaj pri la posedo de tio, kion vi posedas, liberaj de timoj kaj trankvilaj pri via vivo?“ Sed ci diris al mi, ke nia vero estas malamiko de la vivo, kaj nun mi respondas al ci, ke se mi ripetadus de la komenco de la letero tiujn ĉi tri vortojn: „Mi estas feliĉa!“ mi ankoraŭ ne sukcesus esprimi al ci mian feliĉon. Ci diros al mi je tio, ke mia feliĉo estas en Ligia! Jes, kara! Tial, ke mi amas ŝian senmortan animon kaj ke ni amas unu la alian en Kristo, kaj en tia amo ekzistas nek disiĝo, nek perfidoj, nek ŝanĝoj, nek maljuneco, nek morto. Ĉar kiam pasos la juneco kaj beleco, kiam velkos niaj korpoj kaj venos la morto, la amo daŭros, ĉar daŭros la animoj. Antaŭ ol miaj okuloj malfermiĝis al la lumo, mi estis preta por Ligia meti fajron al la propra domo, sed nun mi diras al ci: mi ŝin ne amis, ĉar ami instruis min nur Kristo. Li estas la fonto de feliĉo kaj trankvilo. Ne mi diras tion, sed la realeco mem. Komparu viajn voluptojn, spicitajn per timo, viajn ĝuojn, malcertajn pri la morgaŭo, viajn orgiojn, similajn al enterigaj festenoj, kun la vivo de la kristanoj, kaj ci trovos pretan respondon. Sed por ke ci povu kompari pli bone, venu al niaj montetoj, al niaj

*ombrodonaj olivarbaroj, al niaj hederkovritaj bordoj. Ĉi tie atendas cin trankvilo, kiun ci delonge ne spertis, kaj la koroj, kiuj cin vere amos. Ci, havante animon noblan kaj bonan, devus esti feliĉa. Cia penetrema intelekto scios ekkoni la veron, kaj kiam ci ĝin ekkonos, ci ĝin ekamos, ĉar oni povas eble esti ĝia malamiko, kiel Nerono kaj Tigeleno, sed esti pri ĝi indiferenta scipovas neniu. Ho, mia Petronio, kune kun Ligia mi ĝojas pro la espero, ke baldaŭ mi cin revidos. Restu en sano kaj alvenu!»*

Petronio ricevis la leteron de Vinicio en Kumo, kien li estis irinta kun la aliaj aŭgustanoj, sekvintaj Neronon. Lia multjara batalado kontraŭ Tigeleno estis venanta al la fino. Petronio sciis, ke li devas en ĝi perei, kaj li komprenis la kaŭzojn. Laŭgrade kiel Nerono faladis ĉiutage pli malalten en la rolo de histriono, arlekeno kaj ĉaristo, laŭgrade kiel li profundiĝadis ĉiam pli en degeneran, abomenan kaj kune krudan diboĉadon, la altgusta «*arbiter elegantiae*» iĝadis por li nur ŝarĝo. Eĉ kiam Petronio silentis, Nerono vidis en lia silento mallaŭdon, kiam li laŭdis, li vidis mokon. La brila patricio incitis lian memamon kaj ekscitis ĵaluzon. Liaj riĉaĵoj kaj mirindaj artverkoj iĝis objekto de avido tiel de la regnestro, kiel de la ĉiopova ministro. Oni ŝparis lin ĝis nun pro la vojaĝo en Aĥajon, en kiu lia gusto, lia kompetenteco pri la grekaj aferoj povis

esti utilaj. Sed iom post iom Tigeleno komencis persvadi al Nerono, ke Karinato eĉ superas per la gusto kaj scio Petronion kaj ke li scipovos aranĝi en Aĥajo cirkoludojn, akceptojn, kaj triumfojn pli bone ol Petronio. De tiu momento Petronio estis perdita. Oni ne kuraĝis tamen sendi al li la verdikton en Romo. Same Nerono kiel Tigeleno membris, ke tiu kvazaŭ malhardita estetikulo, «ŝanĝanta nokton en tagon», okupita nur per voluptoj, arto kaj festenoj, kiam li estis prokonsulo en Bitinio kaj poste konsulo en la ĉefurbo, elmontris mirindan laboremon kaj energion. Oni opiniis lin kapabla je ĉio, kaj oni sciis, ke en Romo li posedas amon ne nur de la popolo, sed ankaŭ de la pretorianoj. Neniu el la konfidatoj de Nerono povis antaŭvidi, kiel li kondukus en tiu okazo, ŝajnis do pli prudente ellogi lin el la urbo kaj atingi lin nur en provinco.

Tiucele li ricevis inviton, ke kune kun la aliaj aŭgustanoj li venu en Kumon, kaj li, kvankam li suspektis la ruzon, iris, eble por ne elmontri malkaŝan kontraŭstaron, eble por montri ankoraŭfoje al la imperiestro kaj al la aŭgustanoj vizaĝon gajan, liberan de ĉiaj zorgoj, kaj triumfi lastan antaŭmortan venkon kontraŭ Tigeleno.

Dume ĉi tiu akuzis lin tuj pri amikeco kun la senatano Sceveno, kiu estis la animo de la konspiro de Pizono. La sklavojn de Petronio, restintajn en Romo, oni malliberigis,

la domon oni ĉirkaŭigis per pretoria gardo. Sed li, eksciinte pri tio elmontris nek timon, nek eĉ embarasitecon, kaj diris kun rideto al la aŭgustanoj, kiujn li gastigis en sia propra belega vilao en Kumo:

— Ahenobarbo ne ŝatas rektajn demandojn, do vi viduos, kiel li konfuziĝos, kiam mi demandos lin, ĉu laŭ lia ordono oni malliberigis mian domanaron en Romo.

Poste li anoncis al ili festenon antaŭ la «malproksima vojaĝo» kaj estis ĝuste faranta la preparojn, kiam alvenis la letero de Vinicio.

Petronio, ricevinte ĝin, iom enpensiĝis, post momento tamen lian vizaĝon lumigis la kutima sereneco kaj vespere en la sama tago li reskribis la jenon:

*«Mi ĝojas vian feliĉon kaj admiras viajn korojn, mia kara, ĉar mi ne supozis, ke du geamantoj povas memori pri iu tria kaj malproksima. Vi dume ne nur min ne forgesis, sed vi volas eĉ venigi min en Sicilion por dividi kun mi vian panon kaj vian Kriston, kiu, kiel ci skribas, tiel grandanime malavaras al vi la feliĉon.*

*Se tiel estas, adoru lin. Mi pensas, mia kara, ke Ligian redonis al ci ankaŭ parte Urso kaj parte la Roma popolo. Se la imperiestro estus alia homo, mi kredus eĉ, ke oni ĉesigis la persekutadon pro tiu cia boparenceco kun li, kiun ci ŝuldas al tiu nepi-*

no, kiun Tiberio siatempe edzinigis al unu el Vini-  
cioj. Se ci tamen opinias, ke tion kaŭzis Kristo, mi  
ne diskutos kun ci. Jes! Ne avaru al li oferdonojn.  
Ankaŭ Prometeo sin oferis por la homoj — sed ho-  
ve! Prometeo estas laŭdire nur elpenŝaĵo de la poe-  
toj, dume kredindaj homoj diris al mi, ke ili vidis  
Kriston per siaj okuloj. Mi pensas kune kun vi, ke  
li estas la plej honesta el la dioj.

La demandon de Paŭlo el Tarso mi memoras kaj  
konsentas, ke, se, ekzemple, Ahenobarbo vivus laŭ  
la instruo de Kristo, eble mi havus tempon por ve-  
ni al vi sur Sicilion. Tiam, en la ombro de ĉefontaj  
arboj, ni interparolus pri ĉiuj dioj kaj pri ĉiuj ve-  
roj, kiel iam la grekaj filozofoj. Hodiaŭ mi devas  
doni al ci mallongan respondon.

Nur du filozofojn mi volas koni: unu nomas sin  
Pirono, la alia Anakreonto. La ceterajn kun la tuta  
skolo de la grekaj kaj niaj stoikistoj mi povas cedi  
al ci por malalta prezo. La vero loĝas ie tiel alte,  
ke la dioj mem ne povas ĝin vidatingi de la supro  
de Olimpo. Al ci, mia kara, ŝajnas, ke via Olimpo  
estas ankoraŭ pli alta, kaj starante sur ĝi, ci vokas  
al mi: „Suriru, kaj ci vidos tian panoramon, kian  
ci ne vidis ĝis nun“. Sed mi respondas al ci: „Ami-  
ko, mi ne havas krurojn!“ kaj kiam ci legos ĉi tiun  
leteron ĝisfine, mi kredas, ke ci konfesos min pra-  
va.

Ne, feliĉa edzo de reĝidino Aŭroro! Via instruo ne

estas por mi. Ĉu mi amu la bitinianojn, kiuj portas mian portilon, la egiptojn, kiuj hejtas en mia banejo, Ahenobarbon kaj Tigelenon? Ĝe la blankaj genuoj de l' ĥaritoj mi ĵuras al ci, ke eĉ se mi volus, mi ne povus. En Romo estas minimume cent miloj da homoj, havantaj aŭ malegalajn skapolojn, aŭ dikajn genuojn, aŭ trosekajn krurojn, aŭ rondajn okulojn, aŭ tro grandajn kapojn. Ĉu ci ordonas al mi ami ankaŭ ilin? Kie mi trovu tiun amon, se mi ne sentas ĝin en la koro? Kaj se via dio volas, ke mi amu ilin ĉiujn, kial en sia ĉiopovo li ne donis al ili la formon, ekzemple, de la Niobidoj, kiujn ci vidis sur Palatino? Kiu amas belon, samfakte ne povas ami malbelon. Alia afero estas ne kredi je niaj dioj, sed oni povas ilin ami, kiel amis ilin Fidio, kaj Praksitelo, kaj Mirono, kaj Skopaso, kaj Lizipo. Eĉ se mi volus iri tien, kien ci min vokas, mi ne povus, kaj ĉar mi ne volas, tial mi duoble ne povas. Ci kredas, kiel Paŭlo el Tarso, ke iam, trans Stikso, sur iuj Elizeaj kampoj vi vidos vian Kriston. Bone! Li mem diru al ci tiam, ĉu li akceptus min kune kun miaj gemoj, kun mia vazo el Murho, kun miaj eldonaĵoj de Sozioj kaj kun mia Orharulino? Ĉe la penso pri tio mi sentas inklinon al rido, mia kara, ĉar eĉ Paŭlo el Tarso diris ja al mi, ke por Kristo oni devas rezigni la rozkronojn, la festenojn kaj voluptojn. Li promesis al mi, vere, alian feliĉon, sed mi respondis, ke por tio mi estas



tro maljuna, ke miaj okuloj ĉiam trovados plezuron en la vido de rozoj, kaj ke laodoro de violoj ĉiam estos al mi pli agrabla ol laodoro de malpura „proksimulo“ el Suburo.

Jen la kaŭzoj, pro kiuj via feliĉo ne estas por mi. Sed estas krom tio ankoraŭ unu kaŭzo, kiun mi rezervis por la fino. Nome, vokas min Tanatoso. Por vi tagiĝis la vivo, sed por mi la suno jam subiris kaj krepusko ekposedas mian kapon. Alie dirante, mi devas morti, mia kara.

Ne valoras longe paroli pri tio. Tia devis esti la fino. Ci, kiu konas Ahenobarbon, facile tion komprenos. Tigeleno venkis min, aŭ pli ĝuste, ne! Miaj venkoj venis nur al la fino. Mi vivis, kiel mi volis, kaj mi mortos, kiel plaĉos al mi.

Ne afliktiĝu pro tio. Neniu dio promesis al mi senmortecon, do ne renkontas min io neatendita.

Krom tio ci eraras, Vinicio, asertante, ke nur via dio instruas morti trankvile. Ne. Nia mondo sciis antaŭ vi, ke kiam la lasta pokalo estas eltrinkita, estas tempo iri for, ripozi, kaj ĝi scias ankoraŭ fari tion serene. Platono diras, ke la virto estas muziko, kaj la vivo de saĝulo — harmonio. Se tiel estas, tiam mi mortos, kiel mi vivis, virte.

Mi volus ankoraŭ cian dian edzinon adiaŭi per la vortoj, per kiuj mi salutis ŝin iam en la domo de Aŭlo: „Diversajn, tre diversajn mi vidis popolojn, sed ci senegala estas“.

*Do se la animo estas io plia ol opinias Pirono, tiam la mia flugos al vi envoje al la limoj de Oceano<sup>338</sup> kaj eksidos apud via domo en la formo de papilio, aŭ, kiel kredas la egiptoj, de nizo.*

*Alie veni mi ne povas.*

*Kaj dume Sicilio sin ŝanĝu por vi ambaŭ en la Hesperidinan ĝardenon, la kampaj, arbaraj kaj fontaj nimfoj ŝutu florojn sur vian vojon, kaj en ĉiuj akantaĵoj, en la kolonoj de via domo nestu blankaj kolomboj.»*

## Ĉapitro 74<sup>a</sup>

Petronio ne eraris, vere. Du tagojn poste la juna Nervo, ĉiam sindona kaj fidela al li, sendis en Kumon sian liberigiton kun sciigoj pri ĉio, kio okazis en la imperiestra kortego.

La pereco de Petronio jam estis decidita. Oni intencis sendi al li en la sekvonta vespero centuriestron kun la ordono, ke li haltu en Kumo kaj atendu tie pluajn disponojn. Alia kuriero, sendota post kelkaj tagoj, devis porti al li la mortverdikon.

Petronio elaŭskultis la novaĵojn de la liberigito kun sennuba sereneco, poste li diris:

— Portu al cia sinjoro unu el miaj vazoj, kiujn oni do-

<sup>338</sup> Ὠκεανός (gr.) — La mita riverego ĉirkaŭfluanta la teron.

nos al ci antaŭ la foriro. Diru al li ankaŭ en mia nomo, ke mi dankas lin tutkore, ĉar tiamaniere mi povos antaŭi la verdikton.

Kaj subite li ekridis, kiel homo, kiu, kaptinte bonegan ideon, ĝojas antaŭe pro ĝia plenumo.

Ankoraŭ en la sama vespero liaj sklavoj diskuris, invitante ĉiujn en Kumo troviĝantajn aŭgustanojn kaj ĉiujn aŭgustaninojn al festeno en la belega vilao de la arbitro de eleganteco.

Li mem en la posttagmezaj horoj skribis en sia biblioteko, poste banis sin, post kio li ordonis al la *vestofaldistinoj* vesti lin, kaj brila, belvestita, simila al dioj, li eniris por momento en la triklinion por rigardi per okulo de kompetentulo la faratajn preparojn, kaj poste en la ĝardenojn, kie servoknaboj kaj junaj grekinoj el la insuloj plektis el rozoj kronojn por la festenontoj.

Sur lia vizaĝo ne vidiĝis eĉ plej eta zorgo. La servistoj ekkonis, ke la festeno estos io eksterordinara, nur laŭ tio, ke li ordonis disdoni neordinarajn rekompencojn al ĉiuj, de kiuj li estis kontenta, kaj negrandan skurĝadon al ĉiuj, kies laboro ne plaĉis al li aŭ kiuj ankoraŭ antaŭe meritis riproĉon kaj punon. Al la citristoj kaj kantistoj li ordonis pagi malavare antaŭ la festeno, kaj fine, sidiĝinte en la ĝardeno sub fago, tra kies foliaro penetris la sunaj radioj,

puntokovrantaj la teron per lumaj makuloj, li vokis al si Eŭnikon.

Ŝi venis, blanke vestita, kun mirta branĉeto inter la haroj, belega, kiel ĥarito, kaj li sidigis ŝin apud si kaj, facile tuŝinte per la fingroj ŝian tempion, komencis rigardi ŝin kun tia admiro, kun kia artkonanto rigardas dian statuon, verkon de majstra skulptilo.

— Eŭniko, — li diris al ŝi, — ĉu ci scias, ke jam delonge ci ne estas sklavino?

Ŝi levis al li siajn trankvilajn, ĉielbluajn okulojn, kaj komencis nei kapmove.

— Mi estas, sinjoro, ĉiam, — respondis ŝi.

— Sed eble ci ne scias tion, — diris Petronio plu, — ke ĉi tiu vilao kaj tiuj sklavoj, kiuj plektas tie florkronojn, kaj ĉio, kio estas ĉi tie, kaj la kampoj kaj la brutaroj apartenas de hodiaŭ al ci.

Eŭniko, ekaŭdinte tion, forŝoviĝis de li subite kaj per voĉo, en kiu ekvibris subita maltrankvilo, demandis:

— Kial ci tion diras al mi, sinjoro?

Poste ŝi proksimiĝis denove kaj komencis rigardi lin, palpebrumante pro teruro. Post momento ŝia vizaĝo iĝis pala, kiel tolo, dum li ridetis senĉese kaj diris fine nur unu vorton:

— Jes!

Sekvis momento da silento, nur facila bloveto movis la foliojn de la fago.

Petronio povus efektive kredi, ke li vidas antaŭ si statuan, skulptitan el blanka marmoro.

— Eŭniko! — li diris. — Mi volas morti serene.

Kaj la knabino, rigardante lin kun korŝira rideto, elflustris:

— Mi obeos cin, sinjoro.

Vespere la gastoj, kiuj ofte jam ĉeestis la festenojn ĉe Petronio kaj sciis, ke kompare kun ili eĉ la festenoj ĉe la imperiestro ŝajnas enuaj kaj barbaraj, komencis alveni amase, kaj al neniu venis eĉ la penso, ke ĝi povus esti la lasta *symposium*.<sup>339</sup> Multaj sciis, vere, ke super la eleganta arbitro ekpendis la nuboj de la imperiestra malfavoro, sed ĝi okazis jam tiom da fojoj kaj tiom da fojoj Petronio sciis dispeli ilin per unu lerta ago aŭ per unu kuraĝa vorto, ke efektive neniu supozis, ke minacas lin grava danĝero.

Lia gaja vizaĝo kaj la kutima senzorga rideto certigis ĉiujn en ĉi tiu konvinko. La belega Eŭniko, al kiu li diris, ke li volas morti serene, kaj por kiu ĉiu lia vorto estis kva-zaŭ vorto de orakolo, havis en siaj diaj trajtoj kompletan trankvilon kaj en la pupiloj iajn strangajn brilojn, kiujn

<sup>339</sup> *symposium* [simpóziŭm] (lat. de gr. συμπόσιον) — drinkadfesteno, dum kiu oni ankaŭ kantis drinkantojn, aŭskultis flutmuzikon kaj ĝuis dancojn de dancistinoj.

oni povis konsideri ĝojo. En la pordo de la triklinio servoknaboj kun haroj en oraj retoj metis rozkronojn sur la kapojn de la venintoj, kune avertante ilin laŭ la kutimo, ke ili transpaŝu la sojlon per la dekstra piedo. En la salono oni sentis facilan aromon de violoj; lumoj brilis en diverskoloraj aleksandriaj vitraĵoj. Apud la benkoj staris grekaj knabinoj, kies tasko estis surŝprucigi per bonodoraĵoj la piedojn de la gastoj. Ĉe la muroj citristoj kaj atenaj kantistoj atendis la signon de sia ĥorestro.

La vazaro brilis de lukso, sed tiu lukso ne pikis la okulojn, pezis al neniu kaj ŝajnis flori el si mem. Gajeco kaj libereco verŝis sin tra la salono kun la aromo de violoj. La gastoj, enirante ĉi tien, sentis, ke ne ekpendos super ili trudo, nek minaco, kiel okazis ĉe Nerono, kie nesufiĉe altajn aŭ nesufiĉe trafajn laŭdojn oni povis pagi per la vivo. Baldaŭ do, ĉe la vido de la lumoj, de hederornamitaj kruĉoj, de vinoj, glacitenataj en neĝa litaĵo kaj de rafinitaj manĝoj, gajiĝis la koroj de la festenantoj. Interparoloj komencis zumi vigle, kiel zumas abela aro super florkovrita pomarbo. Nur iafoje interrompis ilin eksplodo de gajarido, iafoje murmuro de laŭdoj, iafoje tro laŭta kiso, metita sur blankan brakon.

La gastoj, trinkante vinon, verŝis el la pokaloj po kelke da gutoj al la senmortaj dioj por havigi ilian zorg-

emon kaj afablecon al la mastro. Negrave, ke multaj el ili ne kredis je la dioj. Tiel ordonis la moro kaj superstiĉo. Petronio, kuŝante apud Eŭniko, interparolis pri romaj novaĵoj, pri plej novaj eksedziĝoj, pri amo, amaĵoj, pri vetkuroj, pri Spikulo, kiu famiĝis lastatempe sur la areno, kaj pri la plej novaj libroj, kiuj aperis ĉe Atrakto kaj ĉe la Sozioj. Verŝetante la vinon, li diris, ke li verŝas ĝin nur honore al la kipra diino, kiu estas pli malnova kaj pli granda ol ĉiuj dioj, la sole senmorta, ĉiama kaj reganta.

Lia interparolo estis kiel luma radio, kiu prilumas ĉiam alian objekton, aŭ kiel somera venteto, kiu tuŝas la florojn en ĝardeno. Fine li mansignis al la ĥorestro, kaj je tiu signo facile ekzumis la citroj, dum junaj voĉoj eksonis akompane. Poste dancistinoj el Koso, samlandaninoj de Eŭniko, komencis fulmeti per siaj rozaj korpoj de sub trvideblaj vualoj. Fine egipta aŭguristo komencis aŭguri al la gastoj ilian estontecon laŭ moviĝado de ĉielarke koloraj orfiŝoj, fermitaj en kristala vazo.

Sed kiam ili estis jam sataj de tiuj amuzoj, Petronio levigis iom de sia siria kuseno kaj diris en senzorga tono:

— Geamikoj! Pardonu, ke dum la festeno mi turnas min al vi kun peto: nome akceptu ĉiu el vi, kiel mian donacon, tiun pokalon, el kiu li unue verŝis vinon honore al la dioj kaj je mia prospero.

La pokaloj de Petronio brilis de oro, juveloj kaj majstraj skulptaĵoj, do kvankam disdonado de donacoj estis kutima en Romo, ĝojo superverŝis la korojn de la festantoj. Unuj komencis danki kaj laŭte lin glori, aliaj diris, ke eĉ Jovo mem neniam honoris siajn gastojn sur Olimpo per similaj donacoj; estis fine ankaŭ tiaj, kiuj hezitis antaŭ la akcepto, tiel tiu ĉi fakto superis la ordinaran mezuron.

Li dume levis supren la pokalon el Murho, laŭ la brilo similan al ĉielarko kaj simple netakseblan, poste li diris:

— Kaj jen estas tiu, el kiu mi verŝis honore al la kipra sinjorino. Neniu buŝo tuŝu ĝin de nun kaj neniu mano verŝu el ĝi honore al alia diino.

Kaj li ĵetis la multekostan vazon sur la pargeton, surŝutitan per palviolaj floroj de safrano, kaj kiam ĝi frakasigis en malgrandajn pecetojn, li diris, vidante ĉirkaŭe mirplenajn rigardojn:

— Miaj karaj, ĝoju, anstataŭ miri. Maljuneco, senforteco tio estas malgajaj kunuloj de la lastaj jaroj de la vivo. Sed mi donos al vi bonan ekzemplon kaj bonan konsilon: vidu, oni povas ilin ne atendi, kaj antaŭ ol ili venos, foriri propravole, kiel mi foriras.

— Kion ci volas fari? — demandis maltrankvile kelkaj voĉoj.

— Mi volas ĝoji, trinki vinon, aŭskulti muzikon, rigar-



di tiun ĉi dian korpon, kiun ci vidas apud mi, kaj poste endormiĝi kun florkronita kapo. Mi jam adiaŭis la imperiestron; ĉu ci volas aŭskulti, kion mi skribis al li adiaŭe?

Dirinte tion, li eligis leteron de sub la purpura kuseno kaj komencis legi la jenon:

*Mi scias, ho Cezaro, ke malpacience ci atendas mian alvenon kaj ke cia fidela koro de amiko min sopiras tage kaj nokte. Mi scias, ke ci min surŝutus per donacoj, konfidus al mi la prefektecon de la pretorio, kaj al Tigeleno ci ordonus esti tio, por kio la dioj lin kreis: gardisto de muloj en tiuj ciaz bienoj, kiujn ci heredis, veneninte Domician. Pardonu min tamen, ĉar mi ĵuras al ci je Hadeso kaj en ĝi je la ombroj de ciaz patrino, edzino, frato kaj Seneko, ke veni al ci mi ne povas. La vivo estas granda trezorejo, mia kara, kaj mi sciis el tiu trezorejo elekti la plej valorajn juvelojn, sed estas ankaŭ en la vivo aferoj, kiujn mi ne plu povas elporti. Ho, mi petas cin, ne pensu, kvazaŭ min ŝokis tio, ke ci mortigis cian patrinon, kaj edzinon, kaj fraton, ke ci bruligis Romon kaj sendis en Erebon ĉiujn honestajn homojn el cia regno. Ne, ho pranepo de Kronoso. Morto estas la sorto de l' homa idaro, kaj de ci oni ne povis esperi aliajn farojn. Sed ankoraŭ dum tutaj jaroj vundi la orelojn per cia kantado,*

*vidi ciajn maldikajn krurojn Domiciajn<sup>340</sup> svingiĝadi en greka militdanco, aŭskulti cian ludadon, cian deklamadon kaj ciajn poemojn, mizera poeto el antaŭurbo — jen kio superis miajn fortojn kaj vekis sopiron al morto. Romo ŝtopas la orelojn aŭskultante cin, la mondo cin priridas, kaj plu pro ci ruĝiĝadi mi ne volas, ne povas. La hurlado de Cerbero, mia kara, eĉ se ĝi similus cian kanton, estos al mi malpli malagrabla, ĉar neniam mi estis ĝia amiko kaj mi ne havas la devon honti pro ĝia voĉo. Restu sana, sed ne kantu, mortigu, sed ne skribu versaĵojn, venenu, sed ne dancu, bruligu, sed ne ludu citron — tion ĉi al ci deziras kaj tiun ĉi lastan amikan konsilon sendas al ci*

*Arbiter elegantiae*

La festenantoj rigidiĝis, ĉar ili sciis, ke se Nerono perdis la regnon, tiu bato estus por li malpli kruela. Ili komprenis ankaŭ, ke la homo, kiu skribis tian leteron, devas morti, kaj krome ilin mem kaptis morta timo, ĉar tian leteron ili aŭskultis.

Sed Petronio ekridis per rido tiel sincera kaj gaja, kvaŭzaŭ ĝi estus plej senkulpa ŝerco, poste li kondukis la rigardon sur la ĉeestantojn kaj diris:

<sup>340</sup> Laŭ sia naskiĝo (do, ĝis la adopto fare de Klaŭdio) Nerono apartenis al *gens Domitia* (la familio *Domitii Ahenobarbi*).

— Ĝoju kaj forpelu la timon. Neniu bezonas fanfaroni, ke li aŭskultis ĉi tiun leteron, kaj mi mem fanfaronos per ĝi eble nur al Ĥarono en la momento de l' transveturo.

Poste li kapsignis al greka kuracisto kaj etendis al li la brakon. La lerta greko en unu momento ĉirkaŭligis ĝin per ora ligilo kaj distranĉis la vejnon ĉe la fleksoloko de la mano. La sango ekŝprucis sur la kusenon kaj surverŝis Eŭnikon, kiu, subapoginte la kapon de Petronio, kliniĝis super li kaj diris:

— Sinjoro, ĉu ci pensis, ke mi cin forlasos? Se la dioj volus al mi doni senmortecon kaj la imperiestro la regadon de la mondo, eĉ tiam mi cin sekvus.

Petronio ridetis, leviĝis iom, tuŝis per la buŝo ŝian buŝon kaj respondis:

— Venu kun mi.

Poste li aldonis:

— Ci vere min amis, mia dia!...

Ŝi etendis al la kuracisto sian rozan brakon, kaj post momento ŝia sango komencis sin miksi kaj unuiĝi kun la lia.

Sed li donis signon al la ĥorestro, kaj denove eksonis la citroj kaj la voĉoj. Oni kantis unue «Harmodio»n kaj poste aŭdiĝis kanto de Anakreonto, en kiu la poeto plendas, ke li trovis foje ĉe sia pordo la infanon de Afrodito,

frostotremanta kaj ploranta; li ĝin kunprenis, varmigis, sekigis ĝiajn flugilojn, sed ĝi, sendanka, trapafis rekompence lian koron per sia sago, kaj de tiam lin forlasis la trankvilo...

Kaj ili, apogite unu al la alia, belegaj, kiel paro da dioj, aŭskultis, ridetante kaj paliĝante. Kiam la kanto estis finita, Petronio ordonis disportadi plu vinon kaj manĝaĵojn, poste li komencis interparoli kun la pli proksimaj festenanoj pri aferoj vantaj, sed agrablaj, pri kiaj oni ordinare parolis ĉe festenoj. Fine li vokis la grekon, ke tiu subligu por momento liajn vejnojn, ĉar li diris, ke ekregas lin dormemo kaj li volus ankoraŭ doni sin al Hipnoso, antaŭ ol Tanatoso lin dormigos por ĉiam.

Li endormiĝis, vere. Kiam li vekiĝis, la kapo de la knabino kuŝis jam, simile al blanka floro, sur lia brusto. Tiam li apogis ŝin sur la kuseno por ŝin rigardi ankoraŭ fojon. Poste oni denove malligis al li la vejnojn.

La kantistoj je lia signo ekkantis novan kanton de Anakreonto, kaj la citroj akompanis ilin tute mallaŭte por ne superbrui la vortojn. Petronio iĝadis ĉiam pli pala, kiam tamen la lastaj sonoj eksilentis, li ankoraŭfoje sin turnis al la festenanoj kaj diris:

— Geamikoj, konfesu, ke kune kun ni pereas...

Sed li ne povis fini; lia brako per la lasta movo ĉirkaŭ-

prenis Eŭnikon, poste la kapo falis sur la kusenon — kaj li mortis.

La festenanoj, rigardante la du blankajn korpojn similajn al belegaj statuoj, komprenis — jes, kun tiuj du pereas tio sola, kio ankoraŭ restis en ilia mondo: la poezio kaj la belo.

## Epilogo

Komence la ribelo de la gaŭlaj legioj sub la komando de Vindekso ne ŝajnis tre danĝera. La imperiestro estis en la tridek unua jaro de la vivo kaj neniu kuraĝis esperi, ke la mondo povus jam baldaŭ liberiĝi de la ĝin premeganta inkubo. Oni rememoris, ke en la legioj jam plurfoje dum la antaŭaj regadoj okazis ribeloj, kiuj tamen pasis, ne kaŭzante ŝanĝon de la regnestro. Tiel, en la tempo de Tiberio, Druzo subpremis la ribelon de la panoniaj legioj kaj Germaniko la ribelon de la apudrejnaj. «Kiu povus, cetere, — parolis la homoj, — ekregi post Nerono, se preskaŭ ĉiuj idoj de la dia Aŭgusto pereis dum lia regado?» Aliaj, rigardante kolosojn, prezentantajn lin kiel Herkulon, imagis malgraŭvole, ke neniu forto superos tian potencon. Estis ankaŭ tiaj, kiuj, de kiam li iris Aĥajon, sopiris lian revenon, ĉar Helio kaj Politeto, al kiuj li konfidis la regadon en Romo, regis eĉ pli sange ol li mem.

Neniu estis certa pri sia vivo kaj havaĵo. La leĝo ĉesis defendi. Estingiĝis la homa digno kaj virto, malfirmiĝis la familiaj ligoj, kaj la malnobliĝintaj koroj eĉ ne kuraĝis allasi al si esperon. El Grekujo venadis eĥoj pri senekzemplaj triumfoj de Nerono, pri miloj da kronoj, kiujn li akiris, kaj pri miloj da konkurantoj, kiujn li venkis. La mondo ŝajnis unu orgio, sanga kaj arlekena, sed kune plifortiĝadis la sento, ke venis la fino de virto kaj de seriozaj aferoj, ke alvenis la tempo de danco, muziko, diboĉo, sango, kaj ke de nun tiel jam devas flui la vivo. Nerono mem, al kiu la ribelo malfermis la vojon al novaj raboj, nemulte zorgis pri la ribelantaj legioj kaj pri Vindekso, kaj ofte eĉ esprimis sian ĝojon pro tio. Li malvolis forlasi Grekujon, kaj nur kiam Helio lin sciigis, ke plua prokrasto povas kaŭzi al li perdon de la regno, li ekvojaĝis al Neapolo.

Tie denove li ludis kaj kantis, lasante preter la oreloj la novaĵojn pri ĉiam pli minaca sinsekvo de la okazoj. Vane Tigeleno klarigis al li, ke la antaŭaj ribeloj de la legioj ne havis ĉefon, dum nun estras ĝin viro, devenanta de la malnovaj akvitanaj reĝoj, kaj krome militisto glora kaj sperta.

— Ĉi tie, — respondadis Nerono, — aŭskultas min grekoj, kiuj solaj scias aŭskulti kaj solaj indas mian kanton.

Li parolis, ke lia unua devo estas la arto kaj la gloro.

Sed, kiam atingis lin la scio, ke Vindekso proklamis lin aĉa artisto, li indigniĝis kaj ekvojaĝis al Romo. La vundoj, kaŭzitaj al li de Petronio, kiujn cikatrigo la restado en Grekujo, malfermiĝis denove en lia koro kaj li volis serĉi ĉe la senato justecon por tiel senekzempla ofendo.

Ekvidinte envoje grupon gisitan el bronzo, prezentantan gaŭlan militiston faligitan de roma kavaliro, li konsideris tion bona aŭguro kaj de nun, se li rememoris la ribelantajn legiojn kaj Vindekson, li faris ĝin sole por ilin priridi. Lia enveturo en la urbon superbrilis ĉion, kion oni vidis ĝis tiam. Li veturis sur la sama ĉaro, sur kiu iam Aŭgusto festis sian triumfon. Oni malkonstruis unu arkon de la cirko por malfermi la vojon al la procesio. La senato, la kavaliroj kaj sennombraj amasoj eliris al li renkonte. La muroj tremis de la ekkrioj: «Saluton, Aŭgusto! Saluton, Herkulo! Saluton al ci, dia, unika, olimpa, pitia, senmorta!» Post li oni portis la akiritajn laŭrokronojn, la nomojn de la urboj, en kiuj li triumfis, kaj skribitajn sur tabuloj nomojn de la majstroj, kiujn li venkis. Nerono mem estis kvazaŭ ebria kaj demandis kun emocio la lin ĉirkaŭantajn aŭgustanojn: kio estis la triumfo de Cezaro kompare kun lia triumfo? La penso, ke iu el la mortemuloj kuraĝus levi la manon kontraŭ tian majstron-duondion, ne povis trovi lokon en lia kapo. Li sentis sin vere olimpa, kaj pro tio

mem sekura. La entuziasmo kaj freneza fervoro de la amasoj stimulis lian propran frenezon. Efektive, povis ŝajni en la tago de tiu triumfo, ke ne nur Nerono, sed la tuta mondo perdis ĉian prudenton.

Sub la floroj kaj amasoj da laŭrokronoj neniu sciis distingi abismon. Ankoraŭ en la sama vespero la kolonoj kaj muroj de la temploj kovriĝis per surskriboj, en kiuj oni citis la krimojn de Nerono, minacis al li proksiman venĝon kaj mokis lin kiel artiston. De buŝo al buŝo pasadis la diro: «Li kantis tiel longe, ĝis li vekis la kokojn (*gallos*)<sup>341</sup>». Timigaj famoj komencis trakuri la urbon kaj kreskis ĝis monstra grandeco. Maltrankvilo ekregis la aŭgustanojn. La homoj, necertaj, kion elmontros la estonteco, ne kuraĝis esprimi dezirojn kaj esperojn, ili ne kuraĝis preskaŭ senti kaj pensi.

Kaj li vivis plue nur per teatro kaj muziko. Interesis lin nove elpensitaj muzikiloj kaj nova akva orgeno, kiu estis provata sur Palatino. En sia infaniĝinta menso, nekapbla je plano aŭ faro, li imagis, ke projektoj de cirkoludoj kaj spektakloj, celantaj malproksiman estontecon, per si mem deturnos la danĝeron. Liaj plej proksimaj ĉirkaŭantoj, vidante, ke anstataŭ zorgi pri rimedoj kaj armeo, li klopodas sole pri esprimoj por trafe bildi la teruron de la

<sup>341</sup> *gallos* (lat.): «kokojn» aŭ «gaŭlojn» (akuzativo plurnombra de *gallus* = «koko» kaj «gaŭlo»).



situacio, komencis perdi la kapon. Aliaj tamen pensis, ke li nur mistifikas sin mem kaj ceterajn homojn per citaĵoj, havante en la animo timon kaj maltrankvilon. Efektive liaj agoj iĝis febraj. Ĉiutage miloj da novaj projektoj pasadis tra lia kapo. Iafoje li salte leviĝadis por kuri kontraŭ la danĝeron, ordonis paki sur veturilojn citrojn kaj liutojn, armi junajn sklavinojn kiel amazonojn, kaj samtempe venigi la legiojn el la oriento. Alifoje li pensis, ke ne per milito, sed per kanto li finos la ribelon de la gaŭlaj legioj. Kaj lia animo ridetis al tiu spektaklo, kiu devis okazi post perkanta pacigo de la soldatoj. Jen la legianoj ĉirkaŭos lin kun larmoj en la okuloj, kaj li kantos al ili *epinikion*<sup>342</sup>, post kio nova epoko komenciĝos por li kaj por Romo. Iafoje li postulis sangon; iafoje li deklaris, ke li kontentiĝos per la vicreĝeco de Egiptujo; li rememoris la aŭguristojn, kiuj antaŭdiris al li regadon en Jerusalemo, aŭ kortuŝiĝis per la penso, ke kiel migra kantisto li perlaboros la ĉiutagan panon, kaj la urboj kaj landoj adoros lin jam ne kiel imperiestron, la sinjoron de la tera disko, sed kiel kantiston, kian ĝis nun ne naskis la homaro.

Tiel li baraktis, frenezis, ludis, kantis, ŝanĝadis la intencojn, ŝanĝadis la citaĵojn, ŝanĝadis sian vivon kaj la vivon de la mondo en ian songon sensencan, fantazian

<sup>342</sup> *epinikio*, gr. ἐπινίκιον — glorkanto honore al venkinto.

kaj kune teruran, en laŭtkrian aventuradon, konsistantan el pompaj esprimoj, aĉaj versoj, ĝemoj, larmoj kaj sango, kaj dume la nuboj ĉe la okcidento kreskis kaj potenciĝadis de tago al tago. La mezuro tropleniĝis, la arlekena komedio estis videble venanta al la fino.

Kiam la scio pri Galbo<sup>343</sup> kaj pri aliĝo de Hispanujo al la ribelo atingis liajn orelojn, kaptis lin kolerego kaj furiozo. Li frakasis pokalojn, renversis tablon dum festeno kaj eldonis ordonojn, kiujn nek Helio, nek Tigeleno mem kuragiĝis plenumi. Elmurdi la gaŭlojn loĝantajn en Romo, poste duafoje bruligi la urbon, ellasi ĉiujn bestojn el la bestoj kaj la ĉefurbon transporti en Aleksandron — ĉio ĉi tio ŝajnis al li faro granda, mirinda kaj facila. Sed la tagoj de lia ĉiopovo jam pasis kaj eĉ la antaŭaj kunkrimuloj komencis lin rigardi kiel frenezulon.

La morto de Vindekso kaj malpaco inter la ribelaj legioj ŝajnis tamen denove klini la teleron de la pesilo al lia flanko. Jam novaj festenoj, novaj triumfoj kaj novaj verdiktoj estis anoncitaj en Romo, kiam iun nokton el la tendaro de la pretorianoj venis sur ŝaŭmkovrita ĉevalo sendito, komunikante, ke en la urbo mem la soldatoj ekribelis kaj proklamis Galbon imperiestro.

<sup>343</sup> *Servius Sulpicius Galba* (3 a.K. – 68 p.K.) — Roma nobelo, kiu iĝis imperiestro kaj regis en «la jaro de kvar imperiestroj» de 68-06-06 ĝis 69-01-15.

Nerono dormis en la momento de lia alveno, sed vekiginte, vane li vokis siajn korpogardistojn, postenantajn nokte ĉe la pordoj de la ĉambroj. En la palaco jam regis malpleno. Nur sklavoj rabis en pli malproksimaj anguloj, kion oni povis ankoraŭ momente rabi. Sed lia vido fortimigis ilin, kaj li vagis sola tra la domo, plenigante ĝin per ekkrioj de teruro kaj malespero.

Fine tamen venis lin helpi liberigitoj: Faono, Spiro kaj Epafrodito. Ili volis, ke li forkuru, dirante, ke li ne rajtas perdi ĉe momenton, li tamen iluziis ankoraŭ. Se li, vestite per funebra vesto, ekparolus al la senato, ĉu la senato rezistus al liaj larmoj kaj elokventeco? Se li uzus la tutan parolarton, la tutan elokventecon kaj aktoran talenton, ĉu iuj ajn en la mondo kapablus al li rezisti? Ĉu oni ne donus al li almenaŭ la prefektujon Egiptan?

La liberigitoj, al kutimiĝintaj al flatoj, ne kuraĝis ankoraŭ rekte nei, ili avertis lin nur, ke antaŭ ol li povos atingi Forumon, la popolo disŝiros lin en pecojn, kaj minacis, ke se li tuj ne surĉevaliĝos, ankaŭ ili lin forlasos.

Faono oferis al li rifuĝon en sia vilao, situanta ekster la Nomentana pordego. Post momento ili surĉevaliĝis kaj, kovrinte la kapojn per la manteloj, ekgalopis al la ekstremo de la urbo.

La nokto estis paliĝanta. Sur la stratoj tamen regis jam

movado, anoncanta la eksterordinarecon de la momento. Soldatoj, jen unuope, jen en malgrandaj aretoj, diskuradis tra la urbo. Jam proksime al la tendaro la imperiestra ĉevalo eksaltis subite flanken ĉe la vido de kadavro. Tiam la mantelo deŝoviĝis de la kapo de la rajdanto kaj soldato, kiu ĝuste en tiu ĉi momento pasis preter li, rekonis la regnestron, sed, konfuzita de la eksterordinara renkonto, li salutis lin militiste. Rajdante preter la pretoria tendaro ili ekaŭdis tondrajn ekkriojn je la honoro de Galbo. Nerono ekkomprenis fine, ke proksimiĝas la horo de morto. Kaptis lin timo kaj riproĉoj de la konscienco. Li parolis, ke li vidas antaŭ si mallumon en la formo de nubo, kaj el tiu nubo klinas sin al li vizaĝoj, en kiuj li rekonas la patrinon, la edzinon kaj la fraton. Liaj dentoj klakis pro timo, tamen lia aktora animo trovis kvazaŭ ian ĉarmon en la teruro de la momento. Esti ĉiopova sinjoro de la mondo kaj perdi ĉion ŝajnis al li plejsupro de tragedio. Kaj fidela al si mem, li ludis en ĝi la ĉefrolon ĝis la fino. Ekregis lin febro de citaĵoj kaj pasia deziro, ke la ĉeestantoj konservu ilin en la memoro por la postaj generacioj. Kelkfoje li diris, ke li volas morti kaj vokis Spikulon, kiu mortigadis plej lerte el ĉiuj gladiatoroj. Alifojе li deklamis:

*Patro, patrin', edzino vokas min al morto!*

Trabriloj de espero tamen vekigadis en li de tempo al

tempo, vantaj kaj infanaj. Li sciis, ke li iras al morto, kaj samtempe li tion ne kredis.

La Nomentanan pordegon ili trovis malfermita. Rajdante pluen, ili pasis preter Ostriano, kie instruadis kaj baptadis Petro. Je la tagiĝo ili estis en la vilao de Faono.

Tie la liberigitoj ne kaŝis plu antaŭ li, ke estas la tempo morti, do li ordonis fosi por si kavon kaj kuŝiĝis sur la tero, por ke ili povu precize mezuri la tombon. Sed ĉe la vido de la elfosata tero lin ekregis timo. Lia grasa vizaĝo paliĝis kaj sur la frunto aperis, kvazaŭ gutoj da matena roso, gutoj da ŝvito. Li komencis prokrasti. Per voĉo kune tremanta kaj aktora li deklaris, ke la momento ankoraŭ ne alvenis, poste li komencis denove citi. Fine li petis, ke oni lin bruligu.

— Kia artisto pereas! — li ripetadis kvazaŭ kun miro.

Dume alvenis sendito de Faono kun la sciigo, ke la senato eldonis jam verdikton kaj ke la «patrinmurdinto» estas punota laŭ la malnova kutimo.

— Kio estas tiu kutimo? — demandis Nerono per blankiĝintaj lipoj.

— Oni premos cian kolon per forkego kaj mortskurĝos cin, poste oni ĵetos la korpon en Tiberon, — akre respondis Epafrodito.

Nerono malfermis la mantelon surbruste.

— Estas do la tempo! — li diris, rigardinte la ĉielon.

Kaj li ripetis ankoraŭ fojon:

— Kia artisto pereas!

En la sama momento aŭdiĝis hufbruo de ĉevaloj. Tio estis centuriestro, venanta fronte de soldatoj por kunporti la kapon de Ahenobarbo.

— Rapidu! — ekkriis la liberigitoj.

Nerono almetis ponardon al la kolo, sed li pikis sin nur per la timema mano kaj estis videble, ke neniam li kuraĝos enprofundi la klingon. Tiam Epafrodito neatendite ekpuŝis lian manon; la ponardo eniĝis ĝis la tenilo, kaj la okuloj de Nerono elorbitiĝis — teruraj, grandegaj, timplenaj.

— Mi alportas al ci vivon! — ekkriis la centuriestro<sup>344</sup>, enirante.

— Tro malfrue, — respondis Nerono per raŭka voĉo. Poste li aldonis:

— Jen estas fideleco!

La morto fulmrapide komencis preni en posedon lian kapon. La sango el la dika nuko ŝprucis en nigra torento sur la ĝardenajn florojn. Liaj piedoj komencis bati la teron — kaj li mortis.

Tagon poste la fidela Akteo ĉirkaŭvolvis lin per

<sup>344</sup> La celo de tiu trompo estis malhelpi la sinmortigon: la centuriestro volis kapti Neronon viva.

multekostaj teksaĵoj kaj bruligis sur aromplena ŝtiparo.

Tiel pasis Nerono, kiel pasas uragano, fulmotondro, brulo, milito aŭ pesto, dum la baziliko de Petro regas ĝis nun de la Vatikana altaĵo la urbon kaj la mondon.

Kaj proksime al la iama Kapena pordego staras malgranda kapeleto kun iom defrotita surskribo: **QUO VADIS, DOMINE?**<sup>345</sup>

## F i n o

---

<sup>345</sup> «Kien ci iras, Sinjoro?» (lat.) — citaĵo el la latina versio de «Agoj de Petro», la apokrifio entenanta la epizodon el ĉap. 70<sup>a</sup>.

# Komentaro

## Bibliografio kaj mallongigoj

gr. — greke (fakte, malnovgreke).

hist. — historie.

KE — «Kien ci iras», ĉi tiu prilaboraĵo de la Esperanta traduko.

lat. — latine, en la lingvo latina.

mit. — mite, en la mitaro.

NPIV — «La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto» (2002–2005).

PIV — «Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto» (1975).

QE — «Quo vadis», la Esperanta traduko fare de Lidja Zamenhof (1934).

QP1 — «Quo vadis» originale Pollingva, la unua eldono (1896).

QPM — «Quo vadis» Pollingva, eldono Moderna (de post 1949).

UV — Universala Vortaro de Esperanto (parto de la Fundamento)



## Nomtabelo

(Listo nekompleta. Ne aperas iuj nekontestablaj vaste konataj esperantigoj, ekz-e *Romo*, *Odiseo*, *Eolo* ktp.)

La eroj de la formo «Pyrrho (Πύρρων) → Pirono [PIV]» indikas, ke en QE aperas la latinigo «Pyrrho» de la (greka) nomo «Πύρρων»; dum en KE ĝin anstataŭas la esperantigo «Pirono» (cetere, PIV-a).

La eroj de la formo «Mezembrio ← gr. Μεσημβρία» signifas, ke kaj en QE, kaj en KE estas uzata la esperantigo «Mezembrio», devenanta el la greka «Μεσημβρία».

La eroj de la dusaga formo «Cipro [QE, PIV] ← gr. Κύπρος → Kipro [NPIV]» indikas, ke en QE (kaj en PIV) estas uzata la esperantigo «Cipro», devenanta de la greka «Κύπρος»; dum en KE aperas la (nun preferata kaj NPIV-a) formo «Kipro».

Acilius → Acilio

Acratus (Ἄκρατος) → Akrato

Acte (Ακτή) → Akteo

Aedono ← gr. Ἀηδών

Afer → Afro

Afranius Quintianus → Afranio Kvintiano

Afrodito ← gr. Ἀφροδίτη

Ager Vaticanus → la Kampo Vatikana

Agrippa → Agripo [NPIV]

Agrippina → Agripino [NPIV]

Ahenobarbus → Ahenobarbo – kunnomo de la gento

*Domitia* (Domicioj), al kiu apartenis Nerono. Laŭvorte ĝi signifas «Kuprobarba».

Aĥajo [QE, PIV] ← lat. *Achæa*, *Achaja* ← gr. *Αχαιία* (Homera nomo de Grekujo)

Akryzyona [QP1] = Akryzjona [QPM] → Acrisione [QE] → Akriziono

Akteono [QE, PIV] ← gr. *Ακταίων*, lat. *Actæon*

Aliturus → Alituro

Amfitrito [QE, NPIV] ← gr. *Ἀμφιτρίτη*

Amor<sup>4</sup>o ← Amor

Anicius → Anicio

~~Anneus Gal(t)~~ (*Annæus Gallio?*) → Aneo Galiono (Agoj 18:12)

Anthemios → Antemio

Antistia → Antistia

Antistius → Antistio

Antistius Verus → Antistio Vero

Antium → Ancio

Apicius → Apicio [86]

Apolonio ← gr. *Ἀπολλωνία ἢ Ποντική* – antikva ko-

- lonio, la nuna Bulgaria Созопол (Diogeno el Apolonio)  
 Apolonio [PIV] ← lat. Apollonius ← gr. Απολλώνιος  
 (virnomo)  
 Apolonio el Tiano ← gr. Ἀπολλώνιος ὁ Τυανεύς —  
 filozofo novpitagorismano (1–98 p.K.).  
 Apolono ← Apollo  
 Appius → Appio  
 Aqua Albana → la Lago Albana  
 Aqua Appia → la akvedukto Appia  
 Aquillius Regulus → Akvilio Regulo  
 Aquæ Salviæ → la Fontoj Salviaj  
 Araricus → Arariko  
 Areso [PIV]  
 Argiletum → Argileto  
 Arguso [Z, QE, PIV] ← gr. Ἄργος Πανόπτης  
 Arĥipelago [PIV] ← gr. Ἀρχιπέλαγος [85]  
 Arsacidoj [QE] (la posteuloj de Arŝako, gr. Ἀρσάκης)  
 → Arŝakidoj  
 Arsinoo ← gr. Ἀρσινόη  
 Arulanus (fakte, Arulenus) → Aruleno<sup>27</sup>  
 Asklepio [PIV] ← gr. Ἀσκληπιός [19]  
 Atacinus → Ataceno

<sup>27</sup> Q. Junius **Arulenus** Rusticus (ĉ. 35–93 p.K.) — Roma senatano, amiko de Trazeo (noto [40]), stoikisto. Senkeviĉo (kaj Lidja Z) nomas lin *Arulanus*.

Atelius Hister → Atelio Histro

Ate (gr. Ἄτη) → Ateo

Attis → Atiso

Atractus → Atrakto

Attalus ← gr. Ἄτταλος → Atalo [135]

Aulus Plautius → Aŭlo Plaŭcio [48]

Aureolus → Laŭreolo?<sup>323</sup>

Avirunus → Aviruno

Baal → Baalo [PIV]

Bajoj ← lat. Bajæ → Bajo

Bakĥo [PIV] ← lat. Bacchus ← gr. Βάκχος

Barcus Soranus → Barko Sorano

Bassus → Basso

Baŭloj ← lat. Baŭli → Baŭlo

Benevento ← lat. Beneventum — urbo en la suda Italio

Berenice (Βερενίκη) → Bereniko

Bitinio (*Agroj 16:7, 1Petro 1:1*) ← gr. Βιθυνία, lat. *Bit-hynia* [22].

Bovillæ → Bovilo

Brennus → Brenno

<sup>323</sup> Supozeble temas pri la verko «Laŭreolus» de iu Katulo (samnomulo de la fama poeto), en kiu la rabisto Laŭreolo (el la tempo de imperiestro Kaligulo) iĝas krucumita kaj lasita al la formanĝo per sovaĝaj bestoj. La imperiestro Domiciano foje ekzekutigis kondamnitan krimulon, lasante lin reale plenumi la rolon de Laŭreolo (kiel en la ĉi-suba epizodo).

- Briareo [PIV] ← gr. Βριάρεως [255]  
 Britannicus → Britaniko  
 Brutus → Bruto [Z, PIV]  
 Buksento ← lat. Buxentum ← gr. Πυξοῦς [224]  
 Burrhus → Burro  
 Caius Hasta → Gajo Hasta  
 Caius, Cajus, Gaius → Gajo [PIV]  
 Caja, Gaia → Gaja  
 Calendio → Kalendio  
 Calicratus → Kalikrato  
 Caligula → Kaligulo [PIV]  
 Callina [QP1, QE] → Kallina [QPM]  
 Calvia Crispinilla (QPM: Kalwia Kryspinilla) → Kal-  
 via Krispinilla  
 Campus Martius → Kampo de Marso  
 Carinæ (QP1 ankaŭ Karyny) → (la) Karinoj  
 Cassius → Kasio [PIV]  
 Cassius Chærea → Kasio Ĥereo [150]  
 Celer → Celero  
 Cephas (gr. Κηφᾶς ← aram. kēpā) → Kefas [Joh 1:42,  
 1Kor, Gal] → Kefaso  
 Chilo Chilonides → Ĥilono Ĥilonido  
 Chrestos (Χρηστός), Chrestus → Ĥresto [112]  
 Christus (lat.) ← gr. Χριστός = Krist\*o

- Chrysothemis (Χρυσόθεμις) → Ĥrizotemiso  
 Circus Maximus  
 Claudius → Klaŭdio [PIV]  
 Cletus → Kleto  
 Cibelo [NPIV] ← gr. Κυβέλη  
 Cipro [QE, PIV] ← gr. Κύπρος → Kipro [NPIV]  
 Clivus Argentarius → la Deklivo Arĝenta  
 Clivus Dalphini → la Deklivo Delfina  
 Clivus Publicus → la Deklivo Publika  
 Clivus Virbius → la Deklivo Virbia  
 Corbulo → Korbulono  
 Cornelius → Kornelio  
 Cornelius Martialis → Kornelio Marcialo  
 Cornelius Pudens → Kornelio Pudento  
 Cornutus → Kornuto  
 Cotta → Kotta [QPM]  
 Crispinus → Krispeno  
 Crispus → Krispo  
 Croto → Krotono  
 Cypria [QE] (QPM: Kipryda) → Kipridino [20]  
 Danaë ← gr. Δανάη → Danaino  
 Delfoj [Z, PIV] → Delfo [PIV]  
 Demas → Demaso  
 Demetro ← gr. Δημήτηρ

- Deŭkaliono ← gr. Δευκαλίων  
 Diodorus → Diodoro  
 Diokletiano ← Diocletianus → Diokleciano [PIV]  
 Diomedes → Diomedo [PIV]  
 Drice (lat.) ← gr. Δίρκη → Dirkeo  
 Domitia (Lepida Major) → Domicia  
 Domitius Afer → Domicio Afro  
 Domus aŭrea → la Ora Domo  
 Drusus → Druzo  
 Emauso [PIV] ← gr. Ἐμμαούς ← heb. עמאוס  
 Emporium → Emporio [ReVo]  
 Erebo [PIV] ← gr. Ἔρεβος) – (mit.) personigo de la  
 infera mallumo, filo de Ĥaoso kaj frato de Nokto.  
 Epaphroditus → Epafrodito  
 Epictetus → Epikteto [PIV]  
 Epidaŭro [PIV] ← Epidaurus  
 Eprius Marcellus → Eprio Marcelo  
 Eunice (Εὐνίκη) → Eŭniko  
 Euricius → Eŭrikio (grekigita gota nomo responda al  
 Henriko aŭ E(ŭ)riko)  
 Evander (Εὐάνδρος) → Evandro  
 Fabricius Vejento → Fabricio Vejentono  
 Festus → Festo  
 Fidio [PIV]

- Flavius → Flavio [PIV]  
 Flavius Nepos → Flavio Nepoto  
 Flavius Sabinus → Flavio Sabeno  
 Flavius Scævinius → Flavio Sceveno  
 Focido [PIV] ← gr. Φωκίς [245]  
 Fontejus Capito → Fontejo Kapitono  
 Forum Boarium → la Bova Forumo  
 Forum Cæcilium → la Forumo Cecilia  
 Forum Pistorium → la Forumo Panista  
 Forum Romanum → la Roma Forumo  
 Furnius → Furnio  
 Fænius Rufus → Fenio Rufo  
 Galba → Galbo  
 Gall → Galiono  
 Gelotius → Gelocio  
 Gemellus → Gemelo  
 Germanicus → Germaniko [PIV]  
 Glaucos, Glaucus (Γλαῦκος) → Glaŭko  
 Gorgiaso ← Γοργίας → Gorgio [PIV]  
 Gratus → Grato  
 Gulo → Gulono  
 Hadeso [Z, PIV]  
 Harmodios ← gr. Ἄρμόδιος → Harmodio  
 Hasta → Hasta



Helios, gr. Ἥλιος → Helioso

Helius → Helio

Hekato [NPIV] (gr. Ἑκάτη) — malnovgreka diino tri-forma, luna, mara kaj infera.

Herakleo ← gr. Ἡράκλεια, lat. *Heraclea* [23].

Hermeso [PIV]

Hero [NPIV, QE] ← gr. Ἥρα

Hesperidinoj [PIV]

Hibernio [PIV] — Irlando

Ĥeopso ← gr. Χέοψ

Ĥrizo ← gr. Χρύση — mita insulo dediĉita al Apolono.

Ifida [QP1] → Ifis [QE] → Ifiso

Iono ← gr. Ἴώ, gen. Ἰούς ak. Ἰούν → Ioo

Iras → Iriso

Itilo ← gr. Ἴτυλον

Junius → Junio

Junono [NPIV, QE] ← lat. Jūnō, Junonis

Kakuso ← lat. Cacus ← gr. Κάκος → Kako

Kaledonio [PIV] — Skotlando

Kastoro [PIV] ← gr. Κάστωρ, lat. Castor

Kefalonio, novgreke Κεφαλλονιά (PIV-e ~~Cefalonio~~)

Killo ← gr. Κίλλα — insulo aŭ urbo proksima al Trojo.

Kleopo (greke Κλεόπας) – disĉiplo de Jesuo (Luko 24:18); eble grekigo de la aramea nomo כּלִיפָא

Kolĥido [Z, PIV] ← gr. Κολχίς, lat. *Colchis* [24].

Korioloj [QE] ← Corioli

Koronido ← Κορωνίς → Koroniso

Kresido (gr. Χρυσήδα) → Ĥrizidino

Ksenofano (gr. Ξενοφάνης, ĉ. 570–478 a.K.) – malnovgreka poeto, humoristo kaj filozofo

Kumoj ← Cumæ (lat.) [QPM] → Kumo

Lanio (lat.) [QP1] → Lannio [QE] → Buĉulo

Latono [QE], Latona (?) [NP1V] ← lat. Latona ← gr.

Λητώ

Lecanius → Lekanio

Licinianus → Liciniano

Licinius → Licinio

Licinius Stolo → Licinio Stolono

Lilith → Lilito

Linus (Λῆνος) → Lino [2Tim 21]

Lizipo [PIV] ← Λύσιππος

Locusta → Lokusta [QP1] → Locusta [QE] → Lokus-

ta

Lotofagoj (gr. Λωτοφάγοι)

Lucanus → Lukano [PIV]

Lucino ← lat. Lucina

Lucius Saturninus → Lucio Saturneno

Lucretia → Lukrecia

Lucretius → Lukrecio [PIV]

Lucullus → Lukulo [PIV]

Macrinus → Makreno

Maja (gr. Μαῖα) → Maio [QE] → Majo

Malgranda Azio ← lat. *Asia Minor* → Anatolio [PIV]  
← gr. Ἀνατολή [15]

Mamertina malliberejo – mezepoka nomo de la plej malnova malliberejo de Romo (propre, *Carcer Tullianum*)

Marcus Vinicius → Marko Vinicio

Marcus, Markus → Marko

Mario el Magdalo ← heb. מרים המגדלית → Maria el Magdalo (LB: Maria Magdalena, QPM: Maria z Magdali).

Martinianus → Martiniano

Massinissa (lat.) ← Masensen → Masenseno – la unua reĝo de Numidio.

Maximus → Maksimo

Memfiso ← gr. Μέμφις – la ĉefurbo de la Malnova Regno Egiptuja (la PIV-oj preferas pli egiptecan, sed ankoraŭ malmulte konatan nomformon *Menefro*)

Memmius Regulus → Memmio Regulo

Menelao [PIV]

Menicles → Meniklo

Meocio ← lat. Mæotius [308].

Merio → Meriono

Mezembrio ← gr. Μεσημβρία – urbo en Tracujo [179].

Midaso [PIV].

Minucius Thermus → Municio Termo

Miriam ← heb. מִרְיָם → Mirjam'

Mirono ← gr. Μύρων

Mithridates → Mitridato [PIV]

Mopsus ← gr. Μόψος → Mopso – heroo de la Troja milito, fondinto de orakolejo sciiganta la estontecon per songoj

Mucius Scævola → Mucio Scevolo

Murrha, Myrrha → Murho – nekonata loko el kiu devenis la eksterordinare valorega vazo (pokalo) de Petronio. Pole {waza, czara, kruża} mirreńska. Lidja Z opinias, ke «murho» estas ia ne plu konata materialo: «vazo el murho». Pli detale: Brayley, E.W.: The Graphic and Historical Illustrator..., 1834, p. 341 (anglalingve).

Musonius → Muzonio

Mæcenas → Mecenaso [PIV]

Narcissus, Narcizo [QE] → Narciso [PIV]

Naumachia → Naŭmaĥi[ej]o

Naŭzikao ← gr. Ναυσικάα (NPIV: Naŭsikao)

Nazarius → Nazario

Nereus → Nereo

Neapolo [Z] ← Neapolis – Napolo

Nero → Nerono [PIV]

Nerva → Nervo

Nesuso ← lat. Nessus ← gr. Νέσσος → Neso [NPIV]

[276]

Niger → Nigro

Nigidia → Nigidia

Nimfidius → Nimfidio

Niobo [NPIV] gr. Νιόβη – (mit.) Filino de Tantalo, naskinta 14 gefilojn, ĉiujn sagmortigitajn de Apolono.

Nomentana → Nomentana

Noricum → Noriko

Novius Priscus → Novio Prisko

Numa Pompilius → Numo [PIV] Pompilio

Octavia → Oktavia

Odiseo ← gr. Ὀδυσσεύς

Ŭeta, Ojta (lat.) ← gr. Οἶτη → Ojto

Okeanoso ← gr. Ὠκεανός → Oceano

Ostia → Ostio

Ostorius Scapula → Ostorio Skapula

Ostriano ← Ostriatum – unu el la tombejoj en Romo

Otho → Otono

- Pacht → Paĥto  
 Pafoso [PIV] ← Πάφος: «Antikva urbo en Kipro, fama pro sia templo de Afrodito» [NPIV]  
 Pagus Janiculensis → la Kampo Janikula  
 Pallas (Πάλλας, Πάλλαντος) → Palaso [NPIV]  
 Pandataria ← gr. Πανδατερία → Pandatario  
 Panopo ← gr. Πανοπεύς <sup>245</sup>  
 Parcoj [PIV]  
 Pasiphaë → Pazifao [NPIV]  
 Pasiteo, gr. Πασιθέα → Paziteo  
 Paroso [PIV]  
 Paris → Pariso [Z, PIV]  
 Pedanius Secundus → Pedanio Sekundo  
 Pentelikono  
 Periodonica, Periodonices (περιοδονίκης) → Periodoniko<sup>233</sup>  
 Pessinus (gr. Πεσσινούς) → Pesinunto  
 Persius → Persjo  
 Petronius (QP1: Petroniusz) → Petronio [PIV]  
 Phaon (Φάων) → Faono  
 Phlego → Flegono

<sup>245</sup> **Panopo** (gr. Πανοπεύς) — urbo en **Focido** [PIV] (gr. Φωκίς, parto de la antikva Greklando norden de la Korinta golfo).

<sup>233</sup> *Periodoniko* (gr. περιοδονίκης lat. periodonica) estas malnovgreka titolo de atleta venkinta en ĉiuj 4 «Tuthelenujaj ludoj» («periodoj»). Nerono sin proklamis periodoniko.

- Pincius → Pincio  
 Plautius Lateranus → Plaŭcio Laterano  
 Plinius → Plinio [PIV]  
 Politetes → Politeto  
 Polukso ← Pollux  
 Pompejus → Pompeo [PIV]  
 Pomponia Græcina → Pomponia Grecina  
 Pomponius → Pomponio  
 (Pons) Cestius → la ponto Cestia  
 (Pons) Milvius → la ponto Milvia  
 Pons Sublicius → la Fostoponto  
 Pons Æmilius → la ponto Emilia  
 Pontius Pilatus → Poncio Pilato [PIV]  
 Pontius Telesinus → Poncio Telezeno  
 Pontus Euxinus ← gr. Εὐξεινος Πόντος → Pont-Eŭk-  
 seno [NPIV] [179] (QE: Ponto Eŭksino)  
 Poppæa → Popea  
 Porta ~~Trigenia~~ Trigemina → la Triobla pordego  
 Porta Appia → la pordego Appia  
 Porta Asinaria → la Azena pordego  
 Porta Capena → la pordego Kapena  
 Porta Cælimontana → la pordego Celimonta  
 Porta Flaminia → la pordego Flaminia  
 Porta Mugionis → la pordego Mugiona

- Porta Ostiensis → la pordego Ostia  
 Porta Salaria → la Sala pordego  
 Porticus Æmilia → la Portiko Emilia  
 Praksitelo [PIV]  
 Processus → Proceso  
 Proculus → Prokulo  
 Protagoro [PIV] ← Πρωταγόρας  
 Prodiko ← Πρόδικος  
 Proximus → Proksimo  
 Psyche (Ψυχή) → Psiĥo  
 Pyrrho (Πύρρων) → Pirono [PIV]  
 Pythagoras (Πυθαγόρας) → Pitagoro [PIV]  
 Rostra → Rostroj [PIV]  
 Quartus → Kvarto  
 Quintianus → Kvintiano  
 Rex Nemorensis → Nemorena reĝo  
 Rubelius Plautus → Rubelio Plaŭto  
 Rubria → Rubria  
 Ruffinus → Rufeno  
 Rufius (fakte, Rufrius) → Rufrio  
 Rufrius Crispinus → Rufrio Krispeno  
 Sallustius → Salustio  
 Saturno [PIV, QE] ← Saturnus  
 Scaurus → Skaŭro



- Scribonia → Skribonia  
Scævinus → Sceveno  
Secundus Carinas → Sekundo Karinato  
Sejanus → Sejano  
Seneca (Lucius Annæus Seneca) → (Lucio Aneo) Seneko [Z, PIV]  
Septimiana → (la pordego) Septima  
Serapeum → Serapejo [PIV]  
Serapis → Serapo [PIV]  
Seriko ← sericum  
Servius Tullius – Servio Tulio  
Severus → Severo  
Sextus Africanus → Seksto Afrika  
Sferoso – koncepto pri homogena diaro (aŭ diaĵo) en la filozofio de Ksenofano  
Sifax ← Syphāx, Syphācis → Sifako  
Silanus → Silano  
Sirus → Siro  
Sisenna → Sizeno  
Skopaso ← gr. Σκόπας [176]  
Sminteo ← gr. Σμινθεύς, «reganto de la musoj» – alnomo de Apolono  
Sofonius → Sofonio  
Solina → Solino

Sorakto ← lat. Mons Soracte [61]

Sosius (QPM: Sozjusz) → Sozio

Spartacus → Spartako [PIV]

Spiculus → Spikulo

Spirus → Spiro

Sporus → Sporo

Stabioj ← Stabiæ → Stabio

Staius Domitius → Stacio Domicio

Subrius Flavius → Subrio Flavo

Suburra → Suburo

Suilius Nerulinus → Svilio Neruleno

Sulpicius Asper → Sulpicio Aspero

Sysena [QE] = Sisenna [QPM]

Tanat(os)o ← gr. Θάνατος

Tarso ← lat. Tarsus ← gr. Ταρσός

Tenedo [PIV] ← Τένεδος – Insulo en la Egea maro

Teocles → Teoklo

Terpnos (Τερπνός) → Terpno

Tersito ← Θερσίτης

Thabita (aramee ܛܒܝܬܐ) → Tabita

Theocles → Teoklo

Thrasea, ~~Thraseas, Thrazeas~~ → Trazeo

Tiberiada lago [PIV] – granda nesalakva lago Galilea (Israelo), trafluata de Jordano.

- Tiberis → Tiberio [PIV]  
Tiberius → Tiberio [PIV]  
Tigellinus → Tigeleno  
Tigranes → Tigrano  
Timotheus → Timoteo [PIV]  
Tiridates → Tiridato  
Titus → Tito [PIV]  
Torquatus Silanus → Torkvato Silano  
Transtiberim → Transtibero  
Trimalchio, Trimalchionojn → Trimalhiono(jn)  
Troilo [PIV]  
Tugurinus → Tugureno  
Tullius Senecio → Tulio Seneciono  
Ursus → Urso  
Ustrinum → Ustrino  
Vannius → Vanio  
Vatinius → Vatinio  
Velabrum → Velabro  
Venus, Veneris → Venuso [QE] → Venero [Z]  
Verres → Verreso  
Vespasian [QE] ← lat. Vespasianus (QP1: Vespazyan, QPM: Wespazjan) → Vespaziano [PIV]  
Vesto ← lat. *Vesta* – «Romana diino de la hejma fajro» [NPIV].

- Vestinus → Vesteno  
 Vetus → Veto  
 Via Appia → la Vojo Appia  
 Via Asinaria → la Vojo Azena  
 Via Lata → la Vojo Larĝa  
 Via Nomentana → la Vojo Nomentana  
 Via Ostiensis → la Vojo Ostia  
 Via Portuensis → la Havena Vojo  
 Via Salaria → la Vojo Sala  
 Via Tecta → la Kovrita strato  
 Vibilius → Vibilio  
 Vicus Alexandri  
 Vicus Apollinis → la strato Apolona  
 Vicus Judæorum → la strato Juda  
 Vicus Patricius → la strato Patricia  
 Vicus Sandalarius → la Sandala strato  
 Vicus Sceleratus → la Fia strato  
 Vicus Tuscus → la Tuska strato  
 Viminalo ← lat. collis Viminalis [214]  
 Vindex → Vindekso  
 Vinicius → Vinicio  
 Virginius → Virginio  
 Vitelius → Vitelio  
 Volages → Valagaŝo

Zeŭso [Z, PIV] ← gr. Ζεύς  
Zetoso ← gr. Ζήθος → Zeto

## Glosaro

En la original teksto de la romano abundas latinaĵoj. Multaj el ili en ĉi tiu prilaboraĵo estas tradukitaj; kelkaj aliaj estas asimilitaj (transskribitaj kaj provizitaj je esperantaj finaĵoj). Tiaj porokazaj asimilaĵoj en la teksto (kaj en la kapvortoj de la ĉi-suba Glosaro) aperas kursive, ekz-e *mirmilono*, *triklinio*.

Iom da tiaj neologismaj asimilaĵoj aperis jam en QE; tio estas markita en la glosaj kapvortoj, ekz-e «*kviritoj* [QE]».

La vortoj jam esperantaj, jam troveblaj en la PIV-oj (ekz-e «atrio», «hipokaŭsto», «liktoro», «peplo» aperas en la teksto nemarkite, en la ordinara rekta tiparo ĉefteksta; la vortoj kiuj krome estas oficialaj aŭ eĉ fundamentaj aperas en la glosaj kapvortoj grase (ekz-e **obol<sup>2</sup>o**, **pleb<sup>4</sup>o**, **stadion<sup>8</sup>o**; **kuratoro**, **zorgato**).

Ankaŭ la regulaj derivaĵoj de la jam esperantaj vortoj aperas en la neŭtrale rekta tiparo, ekz-e «atri/estr/o».

areopago [Z, PIV]

atri/estr/o ← lat. *atriensis* — sklavo-gardisto de la

atrio, hejma servisto.

atrio [PIV] (lat. *atrium*) — interna salono (aŭ interna korto) en Roma domo, sen fenestroj, kun aperturo en la plafono kaj pluvakva baseno.

aŭgustanoj ← lat. *augustiani* [170].

aŭreo ← lat. *aureus* (lat.) — altvalora ora monero.

bakĥantino [PIV] — adorantino de Bakĥo en ties orgia kulto.

banisto [QE] ← lat. *balneator* — baneja servisto.

**banked<sup>o</sup>** ← ~~agapo~~ [Z, PIV] — Senkeviĉo parolas pri «agapo en nokto» kiajn aranĝadis inter si membroj de «enterigaj korporacioj» [QE, ĉap. 20<sup>a</sup>]. Imageblas ke Viniĉio povus klarigi al si kristanan agapon per analogio kun kolegaj bankedoj (afero tradicia en Romo; tian analogion faris *E. Renan*); sed ne estas versimila, ke li farus inversan komparon, klarigante korporacian bankedon per al li nekonata «agapo».

bestisto ← lat. *bestiarius* [232].

bisino<sup>z</sup> ← *byssus* [11].

*bulao* ← lat. *bullā* — ora aŭ lada aŭ leda medaliono, globa aŭ plata, ofte korforma, enhavanta amuleton, kiun knaboj el liberulaj familioj portis sur la kolo. [83] (*≠buleo*)

demiurg/o [PIV] — en la antikva filozofio: diaĵo kreinta la materian mondon.

dia ← *diva*

eфеbejo [6] ← *eфеbeium* (lat.←gr.)

*ekuso* ← lat. *æcus* ← gr. οἶκος – salono aŭ halo rigardanta ĝardenon.

*ekzomido* ← lat. *exomis*, *exomidis* ← gr. ἔξωμῖς, ἔξωμίδος – mallonga tuniko sen manikoj, kian plejparte portis laboristoj. («Ekzo-» kiel en «ekzotika»; «-do» kiel en «ĥlamido».)

*epilatoroj* ← *epilatores* – senharigistoj.

*epinikio* (gr. ἐπινίκιον, lat. *epinicium*) – triumfkanto, venkokanto.

**forum**<sup>2</sup>**o** ← lat. *forum* – placo de Romo, kie la popolo pritraktis publikajn aferojn [PIV].

*fridejo* ← *frigidarium* – malvarmiga parto de vaporbanejo.

hamadriado [PIV] ← gr. ἀμαδρυάδες.

harhava teksaĵo ← lat. *cilicium* → harteksaĵo – sak-aĵo [234].

hipogeo [PIV] gr. ὑπόγειον – prahistoria aŭ antikva duone subtera tombo aŭ kultejo.

hipokaŭsto [PIV] (gr. ὑπόκαυστος, lat. *hypocaustum*) – subplanka hejtosistemo.

histriono [PIV] ← *histrion*

hosana! [PIV, LB] ← aramea חַשְׁבָּנָא /<sup>2</sup>uŝa<sup>3</sup>no/, hebree

הוֹשִׁיעָה נָא /hoŝia-na/ (laŭvorte «savu do!»; en kristanismo reinterpretita kiel saluto al savanto) – preĝa ekkrio (QE: Hosanna!)

*ĥaritoj* ← gr. Χάριτες [33].

*ĥattoj* ← lat. *Chatti*, germane *Chatten* – ĝermana tribo kiu vivis en la nuna Hesio, la prauloj de la hesoj, al kiuj ili heredigis sian nomon: *Ĥatti* (1<sup>a</sup> jc) → *Hatti* → *Hazzi* → *Hassi* (7<sup>a</sup> jc) → *Hessi* → *Hessen*. (QE: kattoj)

**intendant<sup>2</sup>o** ← *dispensator* – persono komisiita mastri domon, bienon de riĉulo aŭ nobelo [PIV].

kadavrejo ← *spoliarium* [302].

**kales<sup>\*</sup>o** = lat. *carruca*

*karbasa* (teksaĵo) ← *carbassus*

**kavaliro** [UV] – civitano apartenanta al la ordumo meza inter la pleba kaj la patricia (lat. *eques*; *ordo equestris*, *ordo secundus*)

*Kimerujo* (*Cimmeria* ← gr. Κιμμέρια) – la mita «lando de kimeroj» (Κιμμέριοι), kien ne penetras sunradioj kaj kie situas la enirejo en Hadeson («Odiseado», 11:13–19). Laŭ alia mito, iam la kimeroj deklaris, ke ili ne bezonas la diojn; indignigite de la blasfemo, Hadeso englutis Kimerujon. En la romano tiu nomo ĉiam indikas Hadeson.

**kriptoportiko** [QE] ← lat. *cryptoporticus* – tegmentita pasejo, galerio, koridoro.



**kulpoferoj** ← lat. *piacula* – pentofaraj, pekliberigaj oferoj. La termino «kulpofero» estas biblia, ekz-e Lev 6:17.

**kunnomo** ← lat. *cognomen* – la tria parto de tradicia homnomo latina, herediĝinta alnomo.

**kuratoro** [UV] ← *curator* – zorganto.

**kuristoj** [QE] ← lat. *pedisequi* – sklavo, surpiede akompanantaj la portilon de sia mastro.

**kvadrigo** [Z, PIV] – veturilo kun 4 aljungitaj ĉevaloj.

**kviritoj** [QE] ← lat. *quirites* – romaj civitanoj (*cives*)

**lakoniko** ← lat. *laconicum* [12]

**lararo kaj lararejo** (lat. *lararium*) – kolekto da laroj (vd) kaj resp. la hejma loko por ili.

**laroj** [PIV], lat. *lares* – statuetoj de dioj, gardantaj la hejmon, kiuj kune kun statuetoj de antaŭuloj.

**legisto** [QE] ← *lector* [QP1], sklavo voĉleganta manuskriptojn.

**lemurio** ← lat. *lemur(al)ia* – oferoj por pacigi animojn de malfavoraj mortintoj (la *lemuroj* laŭ PIV), kiujn romanoj plenumis je la 9<sup>a</sup>, 11<sup>a</sup> kaj 13<sup>a</sup> de majo.

**liktoro** [PIV] (lat. *lictor*) – gardisto de altrangulo en Romo.

**Logoso** [QE] ← gr. *λόγος* [131].

**lotofagoj** (gr. *Λωτοφάγοι*) – «lotusmanĝantoj» [217].

*maniplo* [QE] ← lat. *manipulus* [82]

*menadoj* [PIV] (gr. Μαινάδες) — la grekeca vorto responda al la latineca bakĥantinoj.

*minao* ← lat. *mina* ← gr. μνᾶ; PIV-e «mino»

*mirmilono* ← lat. *mirmillo*, *-onis* — gladiatoro en la peza gaŭla kiraso kun figureto de fiŝo sur la pinto de la kasko.

*morao* [PIV] ← lat. *micatio*

*nablo* (gr. νάβλα, lat. *nablium* — fenica harpo. Pro la simileco de la formo la matematikistoj eknomis sian simbolon  $\nabla$  laŭ la greka nomo de tiu muzikilo.

*nomenklatoro* ← lat. *nomenclator* — «nomotenisto», sklavo aŭ liberigito, kies devo estis nomi al la mastro la konatojn kaj klientojn, ĉiujn sklavojn en la domo kaj anonci la surtabligotajn manĝaĵojn.

**obol<sup>2</sup>o** (gr. ὀβολός, lat. *obolus*) — etvalora malnovgreka monero.

*oleadejo*<sup>3</sup> ← *oleotechium*, *elæothesium*

*ordumo* — En antikva aŭ feŭdisma socio, aparta socia grupo, kun heredaj aŭ korporaciaj leĝe fiksitaj devoj kaj rajtoj (lat. *ordo*, *status*; gr. κατάλογος).

**patrici<sup>4</sup>o** — nobelo apartenanta al klaso posedanta la politikan potencon en Romo.

<sup>3</sup> Latine *elæothesium* aŭ *oleotechium* — la parto de vaporbanejo, kie oni olivoleis la banantojn.

peplo [PIV] ← lat. *peplum* – senmanika virina mantelo, kiun oni agrafis sur la ŝultro.

*peripatetiko* ← gr. περιπατητικός – aristotelano [178]

**peristil<sup>2</sup>o** ← lat. *peristylum*

*piedkatenito* ← lat. *compeditus* – homo kun la piedoj katenitaj.

Pitio [PIV]

**pleb<sup>4</sup>o** – malalta klaso en la roma popolo.

*pluvujo* ← lat. *impluvium* – akvujo en atrio, kie kolektiĝis la pluva akvo, falanta tra speciala aperturo en la tegmento.

**prefekt<sup>1</sup>o** – supera roma magistratano.

pretorianoj – soldatoj de la imperiestra gvardio.

pretorio (lat. *prætorium*) – la imperiestra gvardio.

pretoro [PIV] – helpanto de konsulo, neelektita altranga oficisto.

(kampara) punlaborejo [QE]; punĉambro ← *ergastulum*.

retisto ← *retiarius* – gladiatoro luktanta per reto.

sablofosejoj ← *arenaria* [180] [QP1] (QE: sablejoj).

*sambiko* ← *sambuca* ← gr. σαμβύκη – triangula harpo (≠ *sambuk<sup>\*</sup>o* ← lat. *sambucus*!)

«Satirikono» ← lat. *Satyricon* [107].

sekve ← *ergo* – tial.

sesterco [PIV] (lat. *sestertia*)

*sferistoj* ← *spheristæ* – t.e. «pilkistoj»; la vorto povas indiki pilkoludantojn, sed ĉi-okaze temas pri ties servistoj.

*sikambroj* ← lat. *Sicambri* – ĝermana (aŭ kelta?) popolo.

*siko* ← lat. *sica* – malgranda sabro aŭ larĝa ponardo traca-daka-iliria, disvastiĝinta en la tuta Romio. En Romo ĝi kutime estis 30–40 cm longa kaj 3 cm larĝa. Senkeviĉo tamen opinias ĝin «mallonga roma ponardo» (ĉap. 57<sup>a</sup>).

*epiimo* ← lat. *epilimma* [289].

*sirmo* ← lat. *syrma* ← gr. *σύρμα* – antikva vesto kun longa trenajo<sup>286</sup>.

sistro [2Sam 6:5; PIV] ← *sistrum*, *sistra*, *sistræ*

*skriplo* ← lat. *scripulum* = *scrupulum* = *scriplus* – malgranda ora monero, triono de *aŭreo*. (Fakte la latina vorto indikas mezurunuon respondan al nia gramo, pli ĝuste 1137μg; tiusence eble pli avantaĝa formo eble estus *skruplo* – kp la germanan *Skrupel*.)

**stadion<sup>8</sup>o** ← *stadium*

stolo [PIV] ← *stola* – [63].

tabelejo ← lat. *tablinum* – la kabineto kaj akceptejo

<sup>286</sup> Lat. *syrma* – vesto kun longa trenajo, kian uzis i.a. aktoroj-tragediistoj.

de la dommastro [117].

**tabl\*o** = lat. *mensa*

tepidejo [PIV] ← *tepidarium* — seka varma antaŭĉambro de vaporbanejo.

*tesero* ← lat. *tessera* [213].

*teurgo* ← lat. *theurgus* ← gr. θεουργός — sorĉisto, vidiganta diojn kaj fantomojn.

*torĉistoj* ← lat. *lampadarii* — sklavoj portantaj torĉojn.

(armea) *tribunuso* [PIV] ← lat. *tribunus* — mezalta oficira rango en Romio.

*triklinio* (lat. *triclinium*) — manĝoĉambro kun sofoj laŭantaj 3 flankojn de manĝotablo, sur kiuj oni duonkuŝis dum manĝado.

tunelo — ĉi-verke la vorto estas uzata por la signifo «subtera irejo en cirko» (responde al lat. *cuniculum*).

*unktorio* ← *unctuarium*, *unctorium* = oleadejo.

vazetoj ← *epilichnia*

*velariisto* ← lat. *velarius*

*velario* ← lat. *velarium* — antikva speco de tolmarkezo, kurteno ŝirmanta kontraŭ sunradioj.

Venero [Z, NPIV] ← lat. *Venus / Veneris* — Roma diino de la amo responda al gr. Afrodito.

vestalo [PIV] ← lat. *virgo vestalis* (QE: vestpastrino)

*vestofaldistino* ← lat. *vestiplica* [45].

*vigiloj* ← lat. *vigiles urbani* – urbaj gardistoj (policianoj) kaj fajresingistoj.

*vomitorioj* ← lat. *vomitoria*

**zorgato** [UV] ← *alumnus* (*alumna, alumni*) – neple naĝa persono edukata kiel adoptita infano.

## Latinaj vortoj kaj esprimoj.

*arbiter elegantiarum* – plej eleganta kaj bonmaniera homo.

*capitium* [kapítium] → [kapícium] – korsaĵo, vesto kovranta la bruston.

*carissima!* [karisima] – plej kara, karulino!

*carissime!* [karisime] – plej kara, karulo!

*cingulum* – zono.

*domina* – sinjorino.

*eheu!* (lat.) → aĥ ne!; ho ve!

*elæothesium* → oleadejo

*evoe!* – ĝojkrio dum festo de Bakĥo.

*flava coma* – flava aŭ blonda hararo.

*habet* – li havas, li estas trafita, sufiĉe.

*imaginarii* – sklavoportantaj portretojn de la imperiestro.

*innoxia corpora* – senkulpaj korpoj.

*ínsula* → en ĉi tiu romano: = domo.

*janitor* – pordisto.

*lampadarii* → torĉistoj.

*lanista* – posedanto de lernejo por gladiatoroj, gladiatoro.

*ludus matutinus* – ludo, spektaklo matena en cirko.

*lupanar* [QP1] – malĉastejo [QE]

*macte!* [makte] – latina interjekcio responda al la moderna «Brave!»

*mastigophori* (QPM: mastygoforowie) → mastigoforoj – homoj armitaj per vipoj, kiuj vipis stimulante la luktantojn sur cirkareno.

*mensa* → tablo.

*matricida* → patrinmurdinto.

*ocelle mi* – okuleto mia (karesa esprimo)

*oleotechium* → oleadejo

*ostium* (lat.) – pord(eg)o, enirejo.

*panem et circenses!* – panon kaj cirkaĵojn!

*pax vobiscum* → paco al vi [Luk 24:36, Joh 20:21]

*peractum est!* – iĝis!, plenumite!, prete!

*prandium* – en la imperia epoko: la dua matenmanĝo, tagmanĝo.

*pro Christo* → pro Kristo.

*puticuli* – malŝata nomo de komunaj tomboj, kavoj kien oni ĵetis kadavrojn de sklavoj kaj mizeruloj.

*quo vadis, Domine?* — kien ci iras, Sinjoro?

*salve!* — saluton!

*sagatio* — ludo, konsistanta en suprenĵetado de fraŭlino sur soldata mantelo.

*sannio* — amuzisto, komikulo.

*sarmentitii (semaxii)* — vivaj torĉoj el homoj alligitaj al fostoj kaj bruligataj.

*scriptæ duodecim* — antikva formo de damludo.

*synthesis* — malstrikta hejma vesto.

*univira* — «unuedza», (pri virino kiu nur unufoje estis edziniĝinta)


*via* — vojo, strato.

*vicus* — mallarĝa strateto.



# Roma domo riĉula.

(Adaptita bildo el Vikipedio.)



# Notoj

# [1]

«**Petronio**. Latina satira verkisto (*C. Petronius Arbiter*, m. 65).» [PIV]

[^^^]

**[2]**

**Nerono**<sup>z</sup> [PIV] — Romia imperiestro (54–68 p.K.).

[^^^]

# [3]

Latine *elæothesium* aŭ *oleotechium* — la parto de vaporbanejo, kie oni olivoleis la banantojn.

[^^^]

## [4]

*M. Salvius Otho* (32–69 p.K.) — ekstravaganca amiko de Nerono ĝis la jaro 58<sup>a</sup> kiam, puŝate de sia bela edzino *Popæa Sabina*, li konatigis ŝin kun tiu. Ŝi iĝis amorantino de Nerono, eksedziniĝis de Otono, kaj persvadis la imperiestron ekzili Otonon en la provincon Luzitania (la nuna Portugalio).

[^^^]

**[5]**

Aŭtoritatulo pri belgusto kaj bonaj mondumaj manieroj.

[^^^]

## [6]

*ephēbium* (lat.←gr.) – propre, gimnastikejo por efeb-  
oj (antikve, la junaj viroj 18–20 jarojn aĝaj). Ĉi tie temas  
pri baneja parto (pli ofte nomata *sphæristerium*, «plik-  
ejo»), kie oni ekzercis antaŭ bano.

[^^^]



## [7]

Celero (lat. *Celer*), Severo (lat. *Severus*) — arĥitektoj kiuj post la brulego de Romo (64 p.K.) direktos konstruadon de la Ora Domo (vd [337]).

[^^^]

## [8]

*Titus Vatinius* — ŝuisto, poste bufono kaj kortegano de Nerono.

[^^^]

# [9]

**Lukano** [PIV] — latina poeto (*M.A. Lucanus*, 39–65).

[^^^]

# [10]

*Tullius Senecio* — amiko de Otono kaj kortegano de Nerono, poste ano de la Pizona konspiro.

[^^^]

# [11]

Lat. *byssus* — antikva ŝtofo, supozeble farita el lino aŭ kotono; ekz-e *Eliro*, 25:4; *Luko*, 16:19.

[^^^]

# [12]

Latine *laconicum* — «lakona» (= sparta) seka ŝvitejo  
en romia banejo.

[^^^]

# [13]

tepidejo [PIV] — lat. *tepidarium* — seka mezvarma (40–45°C) ĉambro de vaporbanejo.

[^^^]

# [14]

Latine *nomenclator* — sklavo anoncanta la nomon de sia sinjoro aŭ la nomojn de alvenintaj gastoj.

[^^^]



# [15]

Lidja Z. tradukis laŭ la originalo: «Malgranda Azio». Tio estas anakronismo, tia nomo de la duoninsulo (lat. *Asia Minor*) unue aperis en la 5<sup>a</sup> jc.

[^^^]

# [16]

**Tiberio** [PIV] — la dua Romia imperiestro (m. 37 p.K.).

[^^^]

# [17]

*Cn. Domitius Corbulo* (ĉ. 7–67) — Romia militestro, konsulo de la jaro 39<sup>a</sup>. La plej grava militestro de la orienta kampanjo de Nerono.

[^^^]

# [18]

Nomo de gento: «(2) **Parto** (hist.) Ano de iama skita popolo, kiu fondis en Irano potencan imperion» [PIV].

[^^^]

# [19]

**Asklepio** [PIV] (mit.) – malnovgreka dio de medicino.

[^^^]

## [20]

**Kipridino** (en la pola originalo *Kipryda*) estas alnomo de Afrodito—Venero (naskiĝinta ĉe Kipro). Lidja Z tradukis per latinaĵo: *Cypria*.

[^^^]

# [21]

Latine *carbassus* — maldika lina ŝtofo.

[^^^]

## [22]

Tion mencias Tacito (*Analoj*, 16:18). *Bitinio* (gr. Βιθυνία, lat. *Bithynia*) estis nord-orienta regiono de Anatolio.

[^^^]



## [23]

Gr. Ηράκλεια, lat. *Heraclea* — urbo en Bitinio, sur la bordo de la Nigra Maro.

[^^^]

## [24]

Antikva regiono ĉe la Nigra Maro, en la sud-okcidenta Kaŭkazio.

[^^^]

## [25]

*Poppæa* la pli Juna (30–65 p.K.), de post la jaro 63<sup>a</sup>  
*Poppæa Aŭgusta Sabina* – edzino de Nerono, eksedzino  
de Otono (vd [4]).

[^^^]

## [26]

**Valagaŝo la 1<sup>a</sup>** (latine *Vologæsus*) – Partuja reĝo (ĉ. 57–76). **Tiridato** – frato de Valagaŝo, en la jaro 66<sup>a</sup> Nerono faros lin reĝo de Armenujo. **Tigrano la 6<sup>a</sup>** – posteulo de Herodo la Granda, kiun Nerono faris reĝo de Armenujo en 58 p.K.

[^^^]

## [27]

*Q. Junius Arulenus Rusticus* (ĉ. 35–93 p.K.) — Roma senatano, amiko de Trazeo (noto [40]), stoikisto. Senkeviĉo (kaj Lidja Z) nomas lin *Arulanus*.

[^^^]

## [28]

«**Pirano**. La unua el la grandaj helenaj skeptikuloj (ĉ.  
200 a.K.).» [PIV] (gr. Πύρρων)

[^^^]

## [29]

**Sizeno** — probable, persono fikcia, kies nomo estas malsame skribata en diversaj eldonoj: *Sissena* [QP1], *Sisenna* [QPM], *Sysena* [QE]. Oni konas pli fruan historiiston *L. Cornelius Sisenna* (120–67 a.K.), kies traduko de grekaj fabeloj erotika-friponaj servis al Petronio kiel modelo por lia «Satirikono».

[^^^]

# [30]

Suda urbopordego de Romo (lat. *Porta Capena*), de kiu komenciĝas la Vojo Appia, kondukanta al Kapuo.

[^^^]



## [31]

Adeptoj de Asklepio; la greka Ἀσκληπιάδαι povas indiki personojn pretendantajn esti «Asklepiidoj», posteuloj de Asklepio (inter ili Aristotelo kaj Hipokrato); aŭ pastrojn de Asklepio kiuj (kiel ĉi-okaze) sonĝis en ties temploj por kuraci malsanulojn; aŭ ĝenerale kuracistojn.

[^^^]

# [32]

**hipokaŭsto** [PIV] – subplanka hejtosistemo.

[^^^]

## [33]

Ĥaritoj (gr. Χάριτες) – malnovgrekaj diinoj de vivo-  
ĝojo kaj eleganteco (en Romo al ili respondis *la graciaj*).

[^^^]

# [34]

Latine *epilatores* — senharigistoj.

[^^^]

## [35]

«**Agripo**. Romana vira nomo» [PIV] (lat. *Agrippa*). Ĉi tie temas pri *M. Vipsanius Agrippa* (62–12 a.K.), bofilo de Aŭgusto, eminenta militestro kaj konstruinto de akvodukto kaj banejoj.

[^^^]

## [36]

Tacito rakontas (*Analoj*, 14:50), ke *Fabircius Vejento* verkis libron «*Codicilli*» (t.e. «Testamento»), plenan je atakoj kontraŭ eminentuloj. Nerono ordonis ekzili Vejentonon kaj forbruligi lian libron.

[^^^]

# [37]

*patres* (lat.) — patroj, senatanoj.

[^^^]

## [38]

«**Seneko**<sup>z</sup>. Roma filozofo kaj tragediverkisto (*L.A. Seneca*, 4 a.K.—65)» [NP<sub>IV</sub>].

[^^^]



## [39]

C. *Musonius Rufus* (lat.) — roma stoikisto de la 1<sup>a</sup> jc, kiu instruis filozofion dum la regado de Nerono; Epikteto estis lia disĉiplo.

[^^^]

## [40]

*P. Clodius Thrasea Pætus* (m. 66 p.K.) — Roma senatano, neformala ĉefo de la «stoikula opozicio» al Nerono, devigita de tiu sin mortigi.

[^^^]

## [41]

**kuprobarba poeto** — Poezio estis unu el la ĉefaj ŝat-  
okupoj de Nerono. *Kuprobarba* estas la laŭvorta signifo de  
la kunnomo *Ahenobarbus* en la domo Domicia (lat. *gens*  
*Domitia*), al kiu denaske apartenis Nerono. Kaj la aspekto  
de Nerono konformis al tiu nomepiteto.

[^^^]

## [42]

Latine *frigidarium* – malvarmiga parto de vaporbanejo.

[^^^]

# [43]

«Palaso 1 (hist.) Vira nomo, i.a. de favorato kaj mur-  
dinto (kun Agripino) de Klaŭdio» [NPIV]. (Latine *Pallas*  
de la greka Πάλλας, Πάλλαντος.)

[^^^]

## [44]

Latine *unctuarium* aŭ *unctorium* — latinecaj nomoj por tio, kio ĉi-supre [3] aperis sub la nomo *oleadejo*.

[^^^]

# [45]

Latine *vestiplica* — sklavino ordiganta faldojn de toga sur patricioj.

[^^^]

## [46]

En ĉi tiu prilaboraĵo tiu vorto respondas al lat. *familia*, la doma sklavaro.

[^^^]



## [47]

*Aŭfidius Bassus* — roma historiisto, epikurano, amiko de Seneko la pli aĝa.

[^^^]

## [48]

*Aŭlus Plaŭtius* — Romia politikisto kaj militisto, kiu grave rolis en la konkero de Britujo (la jaroj 43<sup>a</sup>–47<sup>a</sup>). Konsulo en la jaro 29<sup>a</sup>.

[^^^]

## [49]

Temas pri *lugioj* (lat. *lugii*, gr. Λούγιοι) kiuj loĝis en la okcidenta parto de la nuna teritorio de Pollando. Senkeviĉo sekvis la nun arkaikan germanan nomon *die Lygier*.

[^^^]

**[50]**

*Sublacum, Subiacum, itale Subiaco.*

[^^^]

# [51]

Gr. Πασιθέα — la plej juna el la ĥaritoj.

[^^^]

# [52]

Latine *Vannius* (regis en la jaroj 19–50 p.K.).

[^^^]

# [53]

Grupo da ĝermanaj triboj (latine *Suevi*, *Suebi*, *Suavi*, *Suevians*).

[^^^]

## [54]

*Drusus Julius Cæsar*, aŭ *Druzo la pli juna* (13 a.K. — 23 p.K.) estis filo kaj heredonto de imperiestro Tiberio (li tamen mortis pli frue ol Tiberio).

[^^^]



# [55]

**Klaūdio**<sup>z</sup> [PIV] — Romia imperiestro (41–56 p.K.; lat. *Claūdius*).

[^^^]

**[56]**

Latina nominativo: *Atelius Hister*.

[^^^]

# [57]

La ĝermanoj (latine *Chatti*, germane *Chatten*) kiuj vivis en la nuna Hesio.

[^^^]

## [58]

Greke Μόψος — heroo de la Troja milito, fondinto de orakolejo sciiganta la estontecon per sonĝoj.

[^^^]

# [59]

**Plinio** (lat. *Plinius*) la maljuna [PIV] – natursciencisto  
(23–79 p.K.).

[^^^]

# [60]

*Venus Genitrix* lat. [vēnus génitriks] — Venero la  
(pra)patrino.

[^^^]

# [61]

*Sorakto* (lat. Mons Soracte, it. Monte Soratte) — monto je 45 km norden de Romo.

[^^^]

## [62]

Temas pri kuzino de Pomponia Grecina, filino de Druzo (*Julia Drusi Cæsaris Filia*), ekzekutita sub Klaŭdio je la 43<sup>a</sup> jaro sekve de akuzo fare de agento de Mesalino. Dum la sekvaj 40 jaroj Pomponia ŝin funebris, kion oni rigardis defio al la imperiestra reĝimo.

[^^^]



## [63]

**stolo** [PIV] (lat. *stola*) – longa vesto de romaj patricianoj.

[^^^]

**[64]**

T.e. en la regno de mortintoj.

[^^^]

# [65]

«Unuedza», t.e. solfoje edziniĝinta.

[^^^]

## [66]

*Cn. Domitius Afer* (m. 59 p.K.) — eminenta oratoro kaj senatano, fifama pro siaj denuncoj.

[^^^]

## [67]

C. *Sophonius Tigellinus* (c. 10–69 p.k.) — prefekto (la estro) de la pretoriana gvardio dum la regado de Nerono.

[^^^]

## [68]

*Ahenobarbus* (lat.) — laŭvorte «Kuprobarba», la familia kunnomo de Nerono (kp [41]).

[^^^]

## [69]

*Sextus Afranius Burrus* (m. 62) — prefekto de pretorianoj (51–62), dum la unuaj jaroj de la Nerona regado kune kun Seneko mentoris la junan imperiestron.

[^^^]

## [69]

Latine *triclinium*, greke τρικλίσιον — manĝoĉambro kun tri trilokaj sofoj laŭantaj tri flankojn de kvadrata manĝotablo, sur kiuj oni duonkuŝis dum manĝado.

[^^^]



# [71]

**laroj** (lat.) — ĉe la romanoj, hejmaj diaĵoj protektantaj.

[^^^]

## [72]

Temas pri la Troja reĝido Pariso, alnome *Aleksandro*, kaj la bela *Heleno*, edzino de Menelao.

[^^^]

# [73]

Transskribo de la greka nomo Εὐνίκη; kp en la Londona Biblio: «via patrino Eŭnike» [2Tim 1:5].

[^^^]

**[74]**

*animal impudens* (lat.) – besto senhonta.

[^^^]

## [75]

Latine *atrium* — en Roma domo, interna korto kiu rolis kiel salono.

[^^^]

## [76]

Latine *velarium* — antikva speco de tolmarkezo, kurenteno ŝirmanta kontraŭ sunradioj.

[^^^]

## [77]

Latine *Carinæ* — aristokrata kvartalo en la sudokcidenta parto de Romo, inter Palatino kaj Eskvilino.

[^^^]

## [78]

Latine *Vicus Sceleratus*, tiel nomita ĉar tie la pli juna filino de Servio Tullio, reĝo de Romo, surveturis en ĉaro la kadavron de sia ĵus murdita patro kaj revenis reĝino makulite de lia ŝprucinta sango.

[^^^]



[79]

Latine *pedisequi*.

[^^^]

## [80]

**Ĥrizotemiso**, greke Χρυσόθεμις — innomo de pluraj personoj de la greka mitaro. Senkeviĉo uzas la poligitan formon *Chryzotemis*, Lidja Z. ĝin latinigas: *Chrysothemis*.

[^^^]

## [81]

*C. Licinius Calvus Stolo* — popoltribunuso, en la jaro 367<sup>a</sup> a.K. kune kun Lucio Sekstio Laterano akceptigis leĝojn favorajn al plebo kaj kamparanoj.

[^^^]

## [82]

**maniplo** (lat. *manipulus*) – taktika unuo de romia armeo, konsistanta el 120–200 homoj (aŭ 2 centurioj).

[^^^]

## [83]

Latine *bullā* — knaba medaliono kun amuleto, ofte en formo de ora globeto aŭ koro.

[^^^]

## [84]

«Nimfo, kiu naskiĝis, vivis kaj mortis kun sia unuani-  
ma arbo» [PIV].

[^^^]

**[85]**

Antikva nomo de la Egea Maro [PIV].

[^^^]

## [86]

*M. Gabius Apicius* — duonmita roma frandemulo de la epoko Tiberia. Sub lia nomo estis publikigita fama libro kulinara.

[^^^]



# [87]

Latine *Forum Romanum*, aŭ simple *Forum* situas sur la sud-okcidenta deklivo de Kapitulo.

[^^^]

**[88]**

«Al Jovo la plej bona, la plej granda» (lat.).

[^^^]

# [89]

«**Rostroj** (hist.) Tribuno sur la Roma forumo, ornam-  
ita de ŝiprostroj» [PIV].

[^^^]

# [90]

**sambiko** (gr. σαμβύκη, lat. *sambuca*) — muzikilo, triangula harpo.

[^^^]

# [91]

Latine *vigiles urbani* — Urbaj gardistoj (policanoj) kaj fajresingistoj.

[^^^]

## [92]

Lat. *Serica* (Senkeviĉo skribis *Sericum*) — lando de silkaĵoj, t.e. Ĉinio.

[^^^]

## [93]

**Cibelo**, pli ĝuste *Kibelo* (gr. Κυβέλη) — Frigia diino, patrino de la dioj, akceptita en la malnovgrekan kaj Roman panteonojn.

[^^^]

# [94]

«Situanta sur la dekstra bordo de Tibero» [NPIV].

[^^^]



# [95]

*cryptoporticus* (lat.) — trapasejo, koridoro, galerio por transpasi domegon.

[^^^]

## [96]

Vigla malriĉula kaj misfama urbokvartalo (lat. *Subura*, *Suburra*). Ĝi situis inter la montetoj Kvirinalo, Viminalo kaj Eskvilino.

[^^^]

# [97]

*Hic est!* [hik est] (lat.) – Ĉi-okaze: «Jen li!».

[^^^]

## [98]

*Lucius Pedanius Secundus* (m. 61 p.K.) — senatano, vickonsulo en 43 p.K., urbestro (prefekto) de Romo ekde la jaro 56<sup>a</sup>. Pilmortigita de sia sklavo.

[^^^]

# [99]

*Ti. Claŭdius Cæsar Britannicus* (41–55 p.K.) — filo de imperiestro Klaŭdio kaj Mesalino.

[^^^]

# [100]

«**Agripino**. Virina nomo, i.a. de la patrino de Nerono.» [NPIV] (lat. *Agrippina*)

[^^^]

# [101]

Insulo apud la Kalabria marbordo, ekzilejo; nun la italia *Ventotene*.

[^^^]

# [102]

*C. Rubellius Plaŭtus* (33–62 p.K.) — Roma nobelo, kiu per sia patrino parenkis kun la Julia dinastio.

[^^^]



# [105]

**morao** [PIV], lat. *micatio* — Hazardudo, en kiu ludanto devas diveni nombron de la fingroj, elstreĉitaj sammomente de ĉiuj kunludantoj. Petronio ĝin mencias en sia «Satirikono».

[^^^]

# [106]

*Jovi Statori templum* (lat.) — templo dediĉita al Jovo la haltiganto de fuĝantoj, savanto.

[^^^]

# [107]

Lat. *Satyricon* — satira verko de Petronio Arbitro.

[^^^]

# [108]

A. *Vitellius Germanicus* (15–69 p.K.) – manĝegemulo, kortegano de Kaligulo, Klaŭdio kaj Nerono; onta imperiestro (dum 8 monatoj) en «la 4-imperiestra jaro» (69 p.K.).

[^^^]

# [109]

*janitor* (lat.) — pordisto.

[^^^]

# [110]

*ostium* (lat.) — pord(eg)o, enirejo.

[^^^]

**[111]**

*salve!* (lat.) — saluton!

[^^^]

## [112]

La vorto «Kristo» devenas el la greka Χριστός /ĥristós/, «(sankt)oleito», laŭvorta grekigo de la hebrea «maŝiaĥ» (t.e. «mesio»). Tiu nocio ne estas konata ekster la juda-kristana tradicio, tial la romanoj konfuzis ĝin kun simila greka vorto χρηστός /ĥrēstós/, «bona, justa, utila», kiu estis pli konvena kiel nomo propra. Tial ekz-e Tacito en siaj «Analoj» nomas kristanojn adeptoj de iu «Chrestus» (/ĥrestus/, latinigo de Χρηστός).

[^^^]



# [113]

Kalvia Krispinilla (lat. *Calvia Crispinilla*) — Roma matrono kiu aranĝadis orgiojn por Nerono.

[^^^]

# [114]

Latine *Noricum* — Romia provinco, la teritorio de la nunaj Aŭstrio kaj Slovenio.

[^^^]

**[115]**

Latine *impluvium*.

[^^^]

# [116]

Latine *velarius*, sklavo kiu zorgas pri kurtenoj kaj velarioj.

[^^^]

# [117]

Latine *tablinum*, *tabulinum* — la kabineto kaj akceptejo de la dommastro, kie estis tenata la arkivo de familiaj dokumentoj (la *tabeloj*).

[^^^]

# [118]

**Vespaziano** [PIV] lat. *T. Flavius Vespasianus* — Roma imperiestro (69–79 p.K.).

[^^^]

# [119]

*Domus transitoria* (lat.) — «Transir[ej]a domo», nomo de palaco de Nerono, situanta inter la piedoj de la montetoj Palatino kaj Eskvilino, kvazaŭ pasejo inter ili (forbrulinta en la incendio de Romo kaj poste rekonstruita kiel la «Ora domo», *Domus aŭrea* [337]).

[^^^]

# [120]

Latine *æcus* — salono aŭ halo rigardanta ĝardenon.

[^^^]



**[121]**

Latine *spheristæ*.

[^^^]

**[122]**

Sinjorino, mastrino (lat.).

[^^^]

# [123]

«Odiseado», kanto 6<sup>a</sup> (la komenco de parolo de Odisseo al Naŭzikao).

[^^^]

## [124]

T.e. similaj al la formoj de la terakotaj statuetoj, kiaj estis farataj en la iama Grekuja urbo Tanagro (Τάναγρα). Pliparton da tanagraj statuetoj oni trovis dum prifosado en 1874, kaj ili restis scienca kaj arta aktualaĵo en la tempo kiam la romano aperis (1894–1896).

[^^^]

# [125]

«**Psiho.** (mit.) Tre bela princino (personigo de la animo), amata de Eroso» [NP<sub>IV</sub>] (gr. Ψυχή).

[^^^]

# [126]

*piscina* (lat.) — fişlageto.

[^^^]

# [127]

Latine *toga prætecta* — blanka purpure borderita togo, kian i.a. portis infanoj ekde 14 ĝis 17 jaroj.

[^^^]

# [128]

«**Tito**. Vira nomo, i.a. de Romia imperiestro, filo de Vespaziano (reginta 79–81)» [NPIV] (lat. *Titus*)

[^^^]



# [129]

**Libitino** — diino de morto kaj entombigo.

[^^^]

**[130]**

Lucius Annæus Cornutus — roma filozofa (stoikisto)  
de la 1<sup>a</sup> jc.

[^^^]

# [131]

**Logoso**, gr. λόγος — en la greka filozofio: la plej baza, esenca strukturo de la estado, la kosma racio; en kristanismo: la Vorto (*Johano* 1:1), kiu estas Jesuo Kristo.

[^^^]

## [132]

Latine *Cimmeria*, greke Κιμμέρια – la mita «lando de kimeroj» (Κιμμέριοι), kien ne penetras sunradioj kaj kie situas la enirejo en Hadeson («Odiseado», 11:13–19); laŭ alia mito, iam la kimeroj deklaris, ke ili ne bezonas la diojn; indignigite de la blasfemo, Hadeso englutis Kimerujon.

[^^^]

# [133]

**Io**, gr. Ἰώ (ankaŭ **Iono** [QE], **Io** [NPIV], **Ioa** [PIV]) estis reĝidino el la greka urbo Argo, amatino de Zeŭso kaj praulino de Heraklo.

[^^^]

# [134]

**Akteo** (gr. Ακτή) — liberigitino kaj amdonantino de Nerono.

[^^^]

# [135]

Greke Ἄτταλος — nomo de pluraj reĝoj Pergamiaj.  
Anakronismo: la lasta reĝo Pergamia, Atalo la 3<sup>a</sup>, testamentis sian reĝujon al Romio kaj mortis en la jaro 133<sup>a</sup> a.K.

[^^^]

# [136]

pretoria soldato, pretoriano — ano de **pretorio** (lat. *prætorium*), la imperiestra gvardio.

[^^^]



**[137]**

*heu, me miserum!* (lat.) — ve, mi malfeliça!

[^^^]

# [138]

*Jovi Liberatori* (lat.) — al Jovo (Jupitero) liberiganto.

[^^^]

# [139]

Latine *lararium*, kolekto da laroj (statuetoj de hejmaj dioj), kaj la loko (lararejo) por ili.

[^^^]

# [140]

**peplo** [PIV] (lat. *peplum*) — senmanika virina mantelo, kiun oni agrafis sur la ŝultro.

[^^^]

# [141]

*Locusta* aŭ *Lucusta* (lat.) — fama roma venenistino (m. 69).

[^^^]

# [142]

**Protagoro** [PIV] (Πρωταγόρας), **Prodiko** (Πρόδικος) kaj **Gorgio** [PIV] (Γοργίας) – malnovgrekaj filozofoj de la 5<sup>a</sup> jc a.K., fondintoj de la sofista skolo.

[^^^]

# [143]

**minao** (gr.  $\mu\nu\tilde{\alpha}$ , lat. *mina*) – antikva mezurunuo de pezo (ĉ. funto), poste monunuo. En la sumera-babilonia 60-uma sistemo, 1 talanto = 60 minaoj. En Londona Biblio *min'o*, en la PIV-oj *mino*.

[^^^]

# [144]

*Ti. Claŭdius Narcissus* (m. 54 p.K.) — ekssklavo de Klaŭdio, kiu partoprenis en konvikto de Mesalino; unu el la unuaj viktimoj de Nerono.

[^^^]



# [145]

Latine *flava coma* (laŭvorte «blonda hararo», pli poezie «orharulino») estis esprimo aludanta facilmoran virinon.

[^^^]

# [146]

«**Epikteto**. Helena stoika filozofa, sklavo en Romo (50–c. 125)» [NPIV] (gr. Ἐπίκτητος).

[^^^]

# [147]

*Lucius Aelius Sejanus* — favorato de Tiberio, konviktita pri konspiro kaj ekzekutita (31 p.K.). Pri la cirkonstancojn raportas Tacito (*Analoj*, V, 9).

[^^^]

**[148]**

Voçlegu [síntezis].

[^^^]

# [149]

«**Kaligulo**. Romia imperiestro post Tiberio, duonfre-  
neza tirano (12–41)» [NPIV] (lat. *Caligula*)

[^^^]

# [150]

*C. Cassius Chærea* (m. 41 p.K.) — tribunuso de la pretoriana gvardio, precipe konata kiel mortiginto de la imperiestro Kaligulo.

[^^^]

# [151]

*Ti. Gemellus* (19–37) — nepo de imperiestro Tiberio, mortigita laŭ ordono de Kaligulo.

[^^^]

# [152]

«**Germaniko**. Kromnomo de Roma konsulo kaj armeestro (*Ti. Drusus Nero*, 16 a.K.–19 p.K.)» [NPIV] (lat. *Germanicus*)

[^^^]



# [153]

*M. Julius Vestinus Atticus* (m. 41 p.K.) — Romia politikisto, amiko de Nerono, konsulo de la jaro 65<sup>a</sup>.

[^^^]

# [154]

*habet* (lat.) — li havas; ĉi tie: trafite!

[^^^]

# [155]

Latine *Antium*, nun la itala *Anzio*, havenurbo sur la bordo de Tirena maro, 50 km suden de Romo. En tiea imperiestra palaco naskiĝis Kaligulo kaj Nerono.

[^^^]

# [156]

Berbera *Masensen*, Latine *Massinissa* (m. 148 a.K.) — la unua reĝo de Numidio.

[^^^]

# [157]

*ocelle mi* (lat.) — okuleto mia (karesa esprimo).

[^^^]

# [158]

**delta, delto<sup>z</sup>** — la greka litero  $\Delta$ , grafike triangula; ĉi tie do, liuto deltoforma.

[^^^]

# [159]

Fenica harpo, greke  $\nu\acute{\alpha}\beta\lambda\alpha$ ; inverse ol pri *delto*, la matematikistoj eknomis sian simbolon  $\nabla$  laŭ la greka nomo de tiu muzikilo.

[^^^]

# [160]

«**Inaño** (mit.) La unua reĝo de Argo.» [NPIV]

[^^^]



# [161]

La malnovgreka poeto, humoristo kaj filozofo Ksenofano (gr. Ξενοφάνης, ĉ. 570–478 a.K.) mokis antropomorfismon kaj hierarkion inter la dioj; ĉiuj dioj devas esti egalaj, ĉar alie nur la plej grava meritis la rangon de Dio; tial la aron da dioj oni metafore konceptu kiel sferon (nomeblan *Sferoso*) kies punktoj egale distancas disde la centro.

[^^^]

# [162]

«**Falerno**. Italia regiono...: *Falerna vino*.» [NPIV]

[^^^]

# [163]

*videant consules!* [vídeant konsules] (lat.) — gardu, ŝtatestroj! (formulo, per kiu la roma senato sin turnis al du ĉefŝtatestroj, kiam la ŝtato troviĝis en danĝero).

[^^^]

# [164]

*pax romana* [paks romana] (lat.) — paco roma.

[^^^]

# [165]

Pli ĝuste, «...ol reĝo en la regno de l' mortintoj» (t.e. en Hadeso) — vd «Odiseado», 11:488–491.

[^^^]

## [166]

Latine *Bajæ* kaj *Baŭli* — La murdo de Agripino okazis dum ŝia reveno el Bajo; kaj apude (ĉe la Averna lago) latinaj poetoj lokis enirejon en Hadeson kaj la mitan «urbon de kimeroj» *Cimmerium*.

[^^^]

# [167]

Latine *lemur(al)ia* (lat.) — oferoj por animoj de mortintoj.

[^^^]

# [168]

Latine *Linus* (m. 76 p.K.) — la unua papo de Romo (aŭ la dua, laŭ la pli malfrua tradicio kalkuli de Petro). La nomformo *Lino* aperas en la Londona Biblio (2Tim 4:21).

[^^^]



# [169]

Latine *lampadarii* — portantoj de torĉoj (lat. *lampadēs* ).

[^^^]

# [170]

Latine *augustiani* — sekvantaro de Nerono, junuloj el kavaliraj familioj, kiuj agis kiel lia fan-klubo kaj aplaŭdistaro.

[^^^]

# [171]

Voçlegu [ve mízero mihi] (lat.) — ve al mi malfeliça!

[^^^]

# [172]

**Hekato** [NPIV] (gr. Ἑκάτη) — malnovgreka diino tri-forma, luna, mara kaj infera.

[^^^]

# [173]

**Erebo** [PIV] (gr. Ἐρεβος) – (mit.) personigo de la infera mallumo, filo de Hæoso kaj frato de Nokto.

[^^^]

# [174]

*extra humanum gáũdium* [ekstra ... gáũdium] (lat.) —  
superhoma ĝojo.

[^^^]

# [175]

Latine *Ubi tu Cajus, (ibi) ego Caja* — geedziğrita formulo prononcata de la fiançino.

[^^^]

# [176]

Μαλνοβρεκα αρχιτεκτο και σкулπτιστο (Σκόπας, 4<sup>α</sup> jc  
a.K.).

[^^^]



# [177]

Greke Θεσπίτης — en «Iliado», la plej malbela, malice  
babilema kaj aroganta el la grekoj sieĝantaj Trojon.

[^^^]

# [178]

T.e. aristotelano. Onidire la nomo *peripatetiko* (gr. περιπατητικός, «promenemulo») aludas la kutimon de Aristotelo instrui promenante kun la disĉiploj.

[^^^]

# [179]

**Pont-Eŭkseno** [NP<sub>IV</sub>] Antikva nomo de la Nigra Maro. **Mezembrio**, gr. Μεσημβρία – urbo en Tracujo, la nuna Bulgaria Несебър.

[^^^]

**[180]**

Latine *arenaria*, fosejoj de kie oni prenis sablon.

[^^^]

# [181]

*matrona stolata* (lat.) — edzino, hejmestrino en vesto de edziniĝinta nobelino.

[^^^]

# [182]

**kanaben<sup>2</sup>o** — Specio de kardelo, birdeto kun malhele ruĝa brusto.

[^^^]

# [183]

T.e. romanoj; laŭ legendo, la fondintojn de Romo, Romulon kaj Remon, mamnutris lupino.

[^^^]

# [184]

**Niobo** [NPIV] gr. Νιόβη — (mit.) Filino de Tantalo, naskinta 14 gefilojn, ĉiujn sagmortigitajn de Apolono.

[^^^]



# [185]

*Græculi* [grekuli] (lat.) – grekoj (malestime).

[^^^]

**[186]**

Arŝakidoj — Partuja dinastio.

[^^^]

# [187]

Greke Ἰησοῦς Χριστὸς Θεοῦ Υἱὸς Σωτήρ → akronime  
ΙΧΘΥΣ (ΙΗΤΙΣ), kio estas la greka vorto por «fiŝo».

[^^^]

# [188]

Lat. *Ostia*; la ĉefa marhavena urbo de la antikva Romo, kaj ĝia unua kolonio ĉe la enfluejo de Tibero en Mediteraneon.

[^^^]

# [189]

Lat. *carissime!* [karisime] – vokkazo de «plej kara!», «karulo!»

[^^^]

# [190]

Bajo, Pompejo<sup>z</sup>, Puteolo, Kumo, Stabio (lat. *Bajæ*, *Pompeji*, *Puteoli*, *Cumæ*, *Stabiæ*) – urbetoj en Kampanio, detruotaj de erupcio de Vezuvio en la 79<sup>a</sup> jaro.

[^^^]

**[191]**

Gr. Αχάϊα — Homera nomo de Grekujo.

[^^^]

**[192]**

Malnovgreka diino de la maro, edzino de Pozidono.

[^^^]



# [193]

«**Pompeo**. Romana nomo, i.a. de generalo kaj regnestro, malamiko de Cezaro (*C. Pompeius*, 106–48 a.K.)»  
[NPIV]

[^^^]

**[194]**

Lat. *Beneventum* — urbo en la suda Italio.

[^^^]

**[195]**

Ŝuisto ne juĝu super ŝuo (lat.).

[^^^]

# [196]

Lat. *Emporium* — apudhavena bazaro en Romo. Kp la dubindan difinon en la PIV-oj: «**emporio** (hist.) Granda komerc-urbo».

[^^^]

# [197]

Latine *exomis* ← gr. ἔξωμίς — mallonga tuniko sen manikoj, kiun plejparte portis laboristoj.

[^^^]

# [198]

Latine *Ostrianum* — unu el la tombejoj en Romo.

[^^^]

# [199]

*la diaj fratoj de Heleno* — Kastoro kaj Polukso.

[^^^]

# [200]

«**tirso 1** (mit.) Bastono, finiĝanta per pinfrukto kaj ĉirkaŭvolvita de hedero kaj vitobranĉo, atributo de Bakĥo kaj Menadoj...» [NPIV] (lat. *thyrsus*).

[^^^]



**[201]**

Ĝojkrio dum Bakĥa festo.

[^^^]

## [202]

Lat. *Murrha*, *Myrrha* estas nekonata loko orienta el kiu devenis iuj eksterordinare valoregaj vazoj kia la pokalo de Petronio.

[^^^]

## [203]

**Majo** (lat. *Maja* ← gr. Μαΐα) — la plej aĝa el la Plejad-oj, la patrino de Hermeso. Al ŝi estas dediĉita la monato *majo*.

[^^^]

**[204]**

**Eureka!** (gr. Εύρηκα) – mi trovis!

[^^^]

# [205]

**hipogeo** [PIV] gr. υπόγειον — prahistoria aŭ antikva  
duone subtera tombo aŭ kultejo.

[^^^]

## [206]

*pontifex maximus* [pontifeks máksimus] (lat.) — ĉefpastro, plej altranga pastro.

[^^^]

# [207]

Laŭvorte «12 linioj» — antikva formo de damludo.

[^^^]

**[208]**

Voçlegu [arka].

[^^^]



## [209]

*Scripulum* aŭ *scrupulum* (lat.) — malgranda ora mone-ro, egala al triono da ora denaro, aŭ *aŭreo*. (*Noto de la aŭ-toro.*)

(Alia latina nomo, *scriplus*, pli oportunas por esper-antigo.)

[^^^]

# [210]

T.e. Aleksandro la Granda, kiu en la templo de Amono aŭdis profetaĵon pri siaj potenco kaj gloro.

[^^^]

# [211]

Nomepiteto de Hermeso, kiu mortigis la centokulan  
giganton Arguso.

[^^^]

## [212]

Gr. Κάκος → lat. *Cacus* — en malnovgreka mito, monstra giganto sputanta fajron kaj fumon, filo de Hefesto kaj Gorgono Meduzo.

[^^^]

# [213]

*tesero*, latine *tessera* — tabuleto, kubeto ktp uzata kiel ĵetono, enira bileto, rekonilo.

[^^^]

# [214]

Latine *collis Viminalis* — la plej malgranda el la 7 klasikaj montetoj de Romo, inter Kvirinalo kaj Eskvilino.

[^^^]

## [215]

La vortoj *ĉiopova*, *plejbono*, *plejvero*, *plejamo* respondas al pola serio kun la prefikso *wszech-*, simila al la latina *omni-*, kiu same konfuzas la ideojn pri «ĉio» kaj «plejo» (*omnipotent; omnibenevolence*).

[^^^]

## [216]

**demiurgo** [PIV], gr. δημιουργός — en la antikva filozofio, diaĵo kreinta la materian mondon.

[^^^]



## [217]

*la lando de la lotofagoj* – en «Odiseado», lando kies enloĝantoj (Λωτοφάγοι) manĝis lotuson, kio kaŭzis forgeson.

[^^^]

# [218]

Nomformo responda al «la Eternulo Cebaot» de la  
Londona Biblio (ekde 1Sam 1:3).

[^^^]

# [219]

«Ŝi sin turnis, kaj diris al li Hebrelingve: Raboni; tio estas Majstro» [*Johano*, 20:16].

[^^^]

# [220]

Disĉiplo de Jesuo, greke Κλεόπας (Luko 24:18); eble grekigo de la aramea nomo קלופא

[^^^]

# [221]

Emauso [PIV] ← gr. Ἐμμαούς ← heb. אמאוס — vilagō  
en Judujo (Luko 24:13–27).

[^^^]

# [222]

Tiberiada lago [PIV] — granda nesalakva lago Galilea (Israelo), trafluata de Jordano.

[^^^]

## [223]

Ambigua kunfanda transskribo (Μαραναθα) de 2 arameaj vortoj – ĝi povas signifi «Venu, Sinjoro!» (= Marana ta, מרנא תא), aŭ eble «Nia Sinjoro venis!» (= Maran ata, מרן את). La Londona Biblio donas la duan interpreton (Maran ata) en 1Kor 16:22.

[^^^]

# [224]

Lat. *Buxentum* — marborda urbo en sudokcidenta Italio (nun la itala urbeto *Policastro Bussentino*).

[^^^]



## [225]

Mezepoka nomo de la plej malnova malliberejo de Romo (propre, *Carcer Tullianum*).

[^^^]

## [226]

La plej granda el la Ioniaj insuloj okcidenten de la kontinenta Greklando; novgreke Κεφαλλονιά (PIV-e ~~Κεφαλονία~~).

[^^^]

## [227]

*Crispus* — Latina nomo, interalie de unu el la apostoloj el la sepdekopo (*Agoj*, 18:8), en la Londona Biblio esperantigita per *Krispo*.

[^^^]

## [228]

Latine *sica* — larĝa ponardo traca-daka-iliria, disvast-  
iĝinta en la tuta Romio.

[^^^]

## [229]

Aedono, ŝanĝita en najtingalon (*Noto de la aŭtoro*).

Laŭ mito, Aedono (Ἄηδών), la edzino de la Teba heroo Zeto (Ζήθος), pro envio provis mortigi la plej aĝan filon de sia bofratino Niobo, sed eraris kaj mortigis sian solan filon Itilon (Ίτυλον). Kompatante ŝian doloron la dioj ŝin ŝanĝis en najtingalon.

[^^^]

# [230]

La aramea nomo [kēpā], grekigite Κηφᾶς (Kefas [Joh 1:42, 1Kor, Gal]), latinigite *Cephas* (en QP1 *Cefas*).

[^^^]

## [231]

«Nemorena reĝo» (lat. *Rex Nemorensis*) estis pastro de Diano kaj de la sankta bosko ĉe la Nemorena lago (lat. *Nemorensis lacus*, itale *Lago di Nemi*). Kutime tiun funkcion plenumis eskapinta sklavo aŭ jure persekutata krimulo; la ofico lin imunigis. Tamen ĉiu ajnulo ratis lin mortigi en duelo kaj sukcedi (kaj tiel akiri rifuĝon).

[^^^]

## [232]

Bestisto (lat. *bestiarius*) — gladiatoro luktanta kontraŭ  
sovaĝaj bestoj, aŭ servisto prizorganta ilin.

[^^^]



# [233]

Latine *compeditus* — homo kun la piedoj katenitaj.

[^^^]

## [234]

*cilícium* (lat.) — teksaĵo el kapraj aŭ kamelaj haroj, kiu estis uzata por fari sakojn kaj pentovestojn; Bible nomata *sakaĵo* (ekz-e *Jona* 3:6). Tiucele oni bredis kaprojn en Kilio (gr. Κιλικία → lat. *Cilicia*), de kie la latina nomo.

[^^^]

# [235]

La romkatolika tradicio identigas Marian el Magdalo la mirhoportantinon (Mar. 16:9, Joh. 20) kun la pentanta pekulino (Luko 7).

[^^^]

## [236]

*Veni, vidi, vici* (lat.) — mi alvenis, rigardis, venkis (la fama raporto de Cezaro al la Senato pri lia rapida venko kontraŭ *Farnaces*, reĝo de Ponto).

[^^^]

# [237]

*Veni, vidi, fugi* (lat.) – mi alvenis, ekrigardis, forkuris.

[^^^]

# [238]

**Kaledonio** [PIV] — antikva nomo de Skotlando. **Hibernio** [PIV] — latina nomo de Irlando.

[^^^]

## [239]

Lat. *Trasumennus/Trasimennus lacus*, it. *Lago Trasimeno* — granda (15 km longa) lago je 150 km norden de Romo.

[^^^]

# [240]

Lat. *theurgus* [tĕ'ūrgus] ← gr. θεουργός — sorĉisto, vidiganta diojn kaj fantomojn.

[^^^]



**[241]**

*proh pudor!* — ho, honto!

[^^^]

## [242]

C. Verres (120–43 a.K.) treege riĉiĝis per prirabado de Sicilio, kiun li misregis en 73–71 a.K. Cicerono komencis sian publikan karieron per siaj 5 akuzaj paroladoj «Kontraŭ Verreso» (*In Verrem*).

[^^^]

## [243]

La ritmo kaj esprimmaniero de tiu repliko sonas versaĵe. La redaktoro de la INKO-eldono tion ne rimarkis kaj banaligis: «trovis amon loĝantan en simila formo».

[^^^]

## [244]

**Mirono** (gr. Μύρων) – malnovgreka skulptisto kaj bronzisto de mezo de la 5-a jarcento a.K., aŭtoro de la «Diskobolo».

[^^^]

# [245]

**Ρανορο** (gr. Πανοπεύς) — urbo en **Focido** [PIV] (gr. Φωκίς, parto de la antikva Greklando norden de la Korinta golfo).

[^^^]

## [246]

**Pesinunta** (lat. *Pessinuntica*) — nomepfiteto de Cibelo (vd la noton [93]), laŭ la templo de la diino en la (ne plu ekzistanta) Anatolia urbo Pesinunto (lat. *Pessinus* ← gr. Πεσσινούς).

[^^^]

# [247]

**Ateo** (gr. Άτη) – malnovgreka diino de kolerego, furioza frenezo.

[^^^]

# [248]

Latine: *Ubi tu Gajus, ibi ego Gaja* — romana geedziğa formulo prononcata de la fiançino.

[^^^]



## [249]

*Pronuba* akompanis novedzinon kaj instruis ŝin pri la  
devoj de edzino. (*Noto de la aŭtoro.*)

[^^^]

# [250]

A. *Persius Flaccus* (34–62) — roma kavaliro, satira poeto, filozofo kaj lernanto de Lukano.

[^^^]

# [251]

«**Sozio.** Helena vira nomo...» [NPIV] (lat. *Sosius*).

[^^^]

## [252]

*Periodoniko* (gr. περιόδονίκης lat. periodonica) estas malnovgreka titolo de atleto venkinta en ĉiuj 4 «Tuthele-  
nujaj ludoj» («periodoj»). Nerono sin proklamis periodo-  
niko.

[^^^]

# [253]

Petronio mokas pri la ŝuista deveno de *Titus Vatinius* (vd la noton [8]).

[^^^]

**[254]**

*Via Littoralis.* (Noto de la aũtoro.)

[^^^]

# [255]

«**Briareo** (mit.) Centbraka giganto» [PIV].

[^^^]

# [256]

**formingo**, gr. φόρμιγγξ — malnovgreka korda muzikilo, praa formo de liro.

[^^^]



# [257]

Ĝermana aŭ kelta popolo kiu loĝis ĉe la rivero Sigo (germane *Sieg* [zi:k]), dekstra alfluanto de Rejno.

[^^^]

## [258]

La loĝantoj de Italujo estis ankoraŭ de Aŭgusto liberigitaj de militservo, pro kio la t.n. *cohors Italica*, postenanta ordinare en Azio, konsistis el volontuloj. Ankaŭ en la pretoria gardistaro, se ĝi ne konsistis el alilandanoj, servis volontuloj. (*Noto de la aŭtoro.*)

[^^^]

# [259]

Voçlegu [makte] — latina interjekcio responda al la moderna «Brave!».

[^^^]

# [260]

«**Pizono**. Familia nomo de pluraj Romaj politikistoj»  
[NP<sub>IV</sub>] (lat. *Piso*)

[^^^]

# [261]

En la tempo de la imperio legio kalkulis pli ol 12.000 homojn. (*Noto de la aŭtoro.*)

[^^^]

## [262]

*M. Annæus Gallio* — frato de Seneko, menciita en la *Agoj*, 18:12 (esperantigita per *Galiono* en la Londona Biblio). La kunnomon *Gallio*, *-onis* li ricevis post kiam lin adoptis la retoro *L. Junius Gallio*. Sin mortigis en 65 p.K. (Senkeviĉo skribis akuzative *Anniusza Gallona* kio ĉe Lidja Z iĝis *Anniusson Galon*.)

[^^^]

## [263]

*Afranius Quintianus* — senatano, ekzekutita pro partopreno en la Pizona konspiro.

[^^^]

## [264]

*Pons Æmilius* — la plej malnova ŝtona ponto de Romo, de kiu nun postrestas nur unu arko (itale *Ponte Rotto*).

[^^^]



# [265]

Komerca kvartalo inter Kapitolo kaj Palatino (lat. *Velabrum*).

[^^^]

## [266]

**Laŭrento** (latine *Laŭrentum*) — antikva marborda havenurbo de la regiono Latio, sudoriente de Ostio.

[^^^]

## [267]

**Deŭkaliono** [PIV] (mit. gr.) — filo de Prometeo, kiu por rekrei la homaron ĵetadis malantaŭ sin ŝtonojn, el kiuj leviĝis homoj.

[^^^]

## [268]

Latine «lumportanta» (interalie, nomepiteto de la planedo Venero). Senkeviĉo skribis la vorton minuskle, virgenre, kaj inter citiloj — ĉu aludante la Klementan Vulgaton, Jes. 14:12, kie ĝi aperas same minuskle?

[^^^]

**[269]**

*sponsa mea* (lat.) — fiancino mia.

[^^^]

## [270]

**Troilo** [PIV] — Troja reĝido, filo de Priamo. **Ĥrizidino** (Χρυσήϊς, Χρυσήϊδα) — filino de Ĥrizo (Χρύσης), pastro de Apolono. Legendo pri amo inter Troilo kaj Ĥrizidino estiĝis en la okcidenteŭropa mezepoko, kaj ĝia mencio en la romano estas anakronismo. (En la okcidentaj transskriboj la nomo *Ĥrizidino* akceptis diversajn formojn, ekz-e *Crisyde*, *Cresseida* ktp; Lidja Z transskribas *Kresido*, kio en Esperanto aspektas kiel patronomo vira: «filo de Kreso»).

[^^^]

# [271]

«**Spartako**. Roma sklavo, kiu kun samsortanoj organizis ribelon kontraŭ Romo (71 a.K.)» [NPIV] (lat. *Spartacus*)

[^^^]

## [272]

*Brennos* aŭ *Brennus* estis la militestro de gaŭloj, kiuj en la jaro 390<sup>a</sup> aŭ 387<sup>a</sup> a.K. venkoprenis kaj forbruligis Romon.

[^^^]



## [273]

*Bona Dea*, gen. kaj dat. *Bonæ Deæ* /bone dee/ (lat.) — en la Roma mitaro, Bona Diino, la diino de casteco kaj fekundeco de romaninoj.

[^^^]

## [274]

La Fostoponto (lat. *Pons Sublicius*), la plej malnova ponto de Romo konstruita sur fostoj (lat. *sublica*). Ĝi ne plu ekzistas. (Senkeviĉo tradukis la nomon: *do mostu Pallowego*, Lidja Z ĝin relatinigis.)

[^^^]

## [275]

Artefarita lageto en Transtibero, aranĝita laŭ ordono de Aŭgusto por prezenti naŭmaĥiojn (gladiatorajn ŝipbatalojn, de la greka ναυμαχία).

[^^^]

# [276]

Gr. Νέσσοσ — la centaŭro kies venenita tuniko mortigis Heraklon.

[^^^]

**[277]**

T.e. Koloseo.

[^^^]

# [278]

Lat. *Lucina*, epiteto aŭ sinonimo de Junono (aŭ iam de Diano), «la Lunluma diino», protektanta la akuŝantinojn.

[^^^]

## [279]

La urbopordego *Porta Cælimontana*, kiu situis sur la monteto Celio (*Cælius Mons*).

[^^^]

## [280]

Pincio (lat. *Mons Pincius*), aŭ «la Ĝardeno monteto», situas en la norda parto de Romo.

[^^^]



# [281]

«**Lukulo**. Roma generalo (1<sup>a</sup> jc a.K.), famiĝinta pro sia  
emo al lukso kaj gastronomio» [NPIV] (lat. *Lucullus*)

[^^^]

# [282]

Monteta tereno (lat. *Ager Vaticanus*) kun la Vatikana Cirko; nun tie situas la baziliko de s-ta Petro.

[^^^]

# [283]

Fakte la tieaj «Ĝardenoj de la Acilioj» (lat. *Horti Aciliorum*) aperis en la 2<sup>a</sup> jc p.K.

[^^^]

## [284]

Kiel indikas ĝia nomo, la pordego *Septimiana* estis konstruita sub Septimo Severo (la jaroj 146–211).

[^^^]

## [285]

Ido (gr. Ἴδη /idē/, lat. Ida) — greka nomo de du montoj en la antikva Helenujo: la unu en Frigio, kaj la alia en Kreto. En la grekaj mitoj tiu nomo rilatas al montoj dediĉitaj al la pramalnova Patrindiino (la Granda Diino), kies kulto venas el la epoko antaŭgreka.

[^^^]

# [286]

Lat. *syrma* — vesto kun longa trenajo, kian uzis i.a. aktoroj-tragediistoj.

[^^^]

# [287]

«**Mecenaso**. (hist.) Amiko de Aŭgusto, protektanto de Horacio kaj Vergilio» [NP<sub>IV</sub>] (lat. *Mæcenas*)

[^^^]

**[288]**

Panon kaj cirkaĵojn! (lat.)

[^^^]



**[289]**

Lat. ĕpilimma — malkara aromaĵo kun forta odoro.

[^^^]

# [290]

Anakronismo? La Azena pordego (lat. *Porta Asinaria*) apartenas al la Aŭrelia Murego, konstruita en la jaroj 271–275 p.K., do 2 jarcentojn post Nerono.

[^^^]

## [291]

Latine *nymphæ Libethrides* – unu el la nomoj de la muzoj, rilata al la fonto Libetro (gr. Λιβηθριᾶς) en Tracujo.

[^^^]

**[292]**

T.e. Gajo Kaligulo (lat. *C. Caligula*).

[^^^]

# [293]

T.e. «Apolono», kies tradicia nomepiteto estas  
ἀργυρότοξος (arĝentpafarka).

[^^^]

# [294]

*Coa vestis* [koa vestis] (lat.) — vesto el insulo Koso (greke Κως), preskaŭ travidebla vesto neĉasta.

[^^^]

## [295]

La plej malalta parto de la malliberejo, kuŝanta tute sub la tero, kun unu sola malfermaĵo en la plafono. Tie mortis pro malsato *Jugurtha*. (*Noto de la aŭtoro.*) — Latine *Carcer Tullianum*.

[^^^]

# [296]

Latine *mirmillo*, *-onis* — gladiatoro en la peza gaŭla kiraso kun figureto de fiŝo sur la pinto de la kasko.

[^^^]



[297]

Latine *piacula*.

[^^^]

**[298]**

*Selisteria* aŭ *Lectisteria*. (Noto le la aŭtoro.)

[^^^]

# [299]

*Quintus Cornelius Pudens* — Roma senatano kaj frua kristano.

[^^^]

**[300]**

Latine ~~cuniculum~~ *cuniculus*, subtera irejo.

[^^^]

**[301]**

*pileolus* (lat.) — ĉapeto.

[^^^]

# [302]

Latine *spoliarium* — ejo kie oni senvestigis mortigitajn gladiatorojn.

[^^^]

# [303]

**edilo** — oficisto zorganta pri konstruaĵoj kaj ordo en la urbo; «(hist.) Roma magistratano» [NPIV].

[^^^]

**[304]**

Voçlegu [andabate].

[^^^]



**[305]**

*Peractum est.*

[^^^]

**[306]**

Saluton Cezaro, armeestro! Mortontoj cin salutas!

[^^^]

**[307]**

*Non te peto, piscem peto,  
quid me fugis, Galle.*

[^^^]

# [308]

Meocio, lat. *Palus Mæotis*, *Mæotius* — la marĉbaroj de la delto de Dono kaj la Azova maro, kiuj antikve estis opiniataj malsaniga loko.

[^^^]

**[309]**

Kristo reğas!

[^^^]

## [310]

Perifrazaj nomoj de Apolono, uzataj de Homero. **Lato-**  
**no:** titanidino, patrino de Apolono kaj Diano. **Tenedo**  
[PIV] Insulo en la Egea maro, kontraŭ Trojo. **Killo** (gr.  
Κίλλα): alia insulo aŭ urbo proksima al Trojo. **Ĥrizo** (gr.  
Χρῦση): mita insulo dediĉita al Apolono.

[^^^]

# [311]

*Sminteo* (gr. Σμινθεύς, «reganto de la musoj») — alno-  
mo de Apolono. Homero mencias templon de Apolono  
*Sminteo apud H̄rizo*.

[^^^]

# [312]

La ekssklavo Akrato (lat. *Acratus* de gr. Ἄκρατος) kaj Sekundo Karinato (*Secundus Carrinas*, gen. *Carrinatis*), pri kies misio Tacito, tre malaprobe, rakontas en siaj *Analoj* (15:45, 16:23).

[^^^]



**[313]**

Sen armilo kaj sen arto (lat.).

[^^^]

# [314]

Lat. *xystus* lat. ← gr. ξυστός — interna galerio en domo.

[^^^]

# [315]

Gr. Οίτη (malnovgreke [ojtē], novgreke [iti]), lat. Œta, Ojta — monto en la mezo de Greklando (38°49′43″N 22°17′19″Or).

[^^^]

# [316]

Dedalo, kiu laŭ aliaj mitoj sukcesis flugi de Kreto Sicion, en la romaj amfiteatroj pereadis same, kiel Ikaro. (*Noto de la aŭtoro*)

[^^^]

## [317]

Gr. Δίρκη, lat. Drice — en greka mito: **Dirkeo**, la edzino de Teba reĝo Liko dum multaj jaroj molestis Antiopon, amatinon de Zeŭso. Kiam la filoj de Antiopo kaj Zeŭso elkreskis kaj konkeris Tebon, ili ekzekutis Dirkeon alliginte ŝin al la kornoj de sovaĝa bovo.

[^^^]

## [318]

*Gājus Mūcĭus Scævōla* — heroa juna patricio, kiu intence metis sian manon en fajron por montri al Etruska reĝo malamika la kuraĝon de la romanoj (6<sup>a</sup> jc a.K.).

[^^^]

# [319]

Du signifoj:

a) Laŭvorte: «senkulpaj, sendanĝeraj korpoj» — do, ĉi-okaze «senkulpaj viktimoj».

b) Frutempa (poste forlasita) nomo de la kristanoj (la prapekon de kies korpoj forlavis Kristo).

[^^^]

# [320]

Esprimo, signifanta: «Jen la plej granda stultulo». (*Nota de la aŭtoro*)

(*Abdera*, Tracuja urbo; laŭ Juvenalo: patrujo de malsaĝuloj kaj kruduloj.)

[^^^]



# [321]

*Tanat(os)o* (gr. Θάνατος) — en la greka mitaro, dio de la morto kaj la morto mem.

[^^^]

## [322]

Lat. *Via Tecta* — supozeble tegmentita (portika) kaj (aŭ) pavimita strato en la Marsa Kampo.

[^^^]

## [323]

Supozeble temas pri la verko «Laŭreolus» de iu Katulo (samnomulo de la fama poeto), en kiu la rabisto Laŭreolo (el la tempo de imperiestro Kaligulo) iĝas krucumitakaj lasita al la formanĝo per sovaĝaj bestoj. La imperiestro Domiciano foje ekzekutigis kondamnitan krimulon, lasante lin reale plenumi la rolon de Laŭreolo (kiel en la ĉi-suba epizodo).

[^^^]

**[324]**

Vd *Agoj* 9:36.

[^^^]

## [325]

*Flavius Scævinius* — pretoriana tribunuso kaj kvestoro, ano de la Pizona konspiro. Laŭ Tacito (*Analoj*, 16:18), Petronion oni akuzis pri amikeco kun Sceveno.

[^^^]

# [326]

*Fænius Rufus* — kolego de Tigeleno, ano de la Pizona konspiro. Ekzekutita en 65 p.K.

[^^^]

# [327]

*Plaūtius Lateranus* — nevo de Aūlo Plaūcio (noto [48]).

[^^^]

## [328]

*Antonius Natalis* — Roma kavaliro, ano de la Pizona konspiro. Arestite inter la unuaj, li perfidis la ceterajn konspiranojn, pro kio ricevis pardonon. — *Subrius Flavius* — pretoriana tribunuso, ano de la Pizona konspiro. Ekzekutita en 65 p.K. — *Sulpicius Asper* — centuriestro de pretoriana kohorto. Ekzekutita en 65 p.K.

[^^^]



## [329]

Cin gvidu Kipridino; kaj steloj klaraj du, la fratoj de Helen'; kaj gvidu ankaŭ de l' ventoj patro (Horaco, *Odoj* 1:3).

[^^^]

**[330]**

Pons Triumphalis. (*Noto de la aũtoro.*)

[^^^]

# [331]

Konstruaĵo en la Kampo de Marso, kie la civitanoj  
kunvenis por voĉdoni.

[^^^]

## [332]

Al la Urbo [t.e. Romo] kaj la mondo (lat.) — formulo per kiu en la antikva Romio komenciĝis gravaj proklamoj. Almenaŭ de la 13<sup>a</sup> jc tiel nomiĝas la «apostolaj benoj» donataj de la papo de Romo en gravaj okazoj.

[^^^]

# [333]

Latine *Aquæ Salviæ* — loko en Romo kie nun situas la preĝejo «S-ta Paŭlo ĉe la Tri Fontoj» (itale *San Paolo alle Tre Fontane*).

[^^^]

## [334]

*Titus Flavius Sabinus* (m. 69 p.K.) — la pli aĝa frato de Vespaziano, konsulo de la jaro 47<sup>a</sup>. Laŭ kristana legendo, lia edzino estis Plaŭcia (*Plaŭtia*), filino de Aŭlo Plaŭcio; kaj tial la nomo *Plaŭtilla* por ilia filino, la nepino de la Plaŭcioj.

[^^^]

**[335]**

1Kor 13:1.

[^^^]

**[336]**

2Tim 4:7-8.

[^^^]



# [337]

Latine *Domus aŭrea* – grandega palaca-parka komplekso en Romo, kiun Nerono konstruigis post la brulego de la 64<sup>a</sup> jaro.

[^^^]

# [338]

Ὠκεανός (gr.) — La mita riverego ĉirkaŭfluanta la teron.

[^^^]

## [339]

*symposium* [simpóziŭm] (lat. de gr. συμπόσιον) — drinkadfesteno, dum kiu oni ankaŭ kantis drinkkantojn, aŭskultis flutmuzikon kaj ĝuis dancojn de dancistinoj.

[^^^]

# [340]

Laŭ sia naskiĝo (do, ĝis la adopto fare de Klaŭdio) Nerono apartenis al *gens Domitia* (la familio *Domitii Ahenobarbi*).

[^^^]

# [341]

*gallos* (lat.): «kokojn» aŭ «gaŭlojn» (akuzativo plur-nombra de *gallus* = «koko» kaj «gaŭlo»).

[^^^]

# [342]

*epinikio*, gr. ἐπινίκιον — glorkanto honore al venkinto.

[^^^]

# [343]

*Servius Sulpicius Galba* (3 a.K. – 68 p.K.) — Roma nobelo, kiu iĝis imperiestro kaj regis en «la jaro de kvar imperiestroj» de 68-06-06 ĝis 69-01-15.

[^^^]

# [344]

La celo de tiu trompo estis malhelpi la sinmortigon: la centuriestro volis kapti Neronon viva.

[^^^]



# [345]

«Kien ci iras, Sinjoro?» (lat.) — citaĵo el la latina versio de «Agoj de Petro», la apokrifo entenanta la epizodon el ĉap. 70<sup>a</sup>.

[^^^]